Bertilo Wennergren

# PMEG
## 2024

Plena Manlibro
de Esperanta Gramatiko

© Bertilo Wennergren 2024, 2023, 2022, 2020, 2005

Ĉi tiu verko estas disponebla laŭ la permesilo
*Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda (CC BY-SA 4.0)*

La internan grafikan fasonon faris Per Aarne Fritzon kaj Bertilo Wennergren

Interretaj kaj elŝuteblaj versioj ĉe <*https://bertilow.com/pmeg/*>

Tiu ĉi eldono de *PMEG* respondas al la HTML-a versio 15.5
(de la 21-a de Junio 2024)

# Enhavo

**Enkonduko** ... **13**

**Skribo kaj elparolo** ... **15**

**1. Skribo** ... **15**
1.1. Literoj ... 15
1.2. Helposignoj ... 16

**2. Elparolo** ... **23**
2.1. Bazaj elparolaj reguloj ... 23
2.2. Specialaj elparolaj reguloj ... 30
2.3. Ne-Esperantaj vortoj – elparolo ... 34

**Gramatiko** ... **37**

**3. Gramatika superrigardo** ... **37**
3.1. Vortospecoj ... 37
3.2. Frazoj kaj frazpartoj ... 38
3.3. Ĉefvortoj kaj rektaj priskriboj ... 41

**4. O-vortoj** ... **43**
4.1. Bazaj reguloj por O-vortoj ... 43
4.2. Uzo de O-vortoj ... 43
4.3. Seksa signifo de O-vortoj ... 44

**5. A-vortoj** ... **51**
5.1. Bazaj reguloj por A-vortoj ... 51
5.2. Uzo de A-vortoj ... 51

**6. E-vortoj** ... **55**
6.1. Bazaj reguloj por E-vortoj ... 55
6.2. Uzo de E-vortoj ... 55

**7. Frazpartoj** ... **59**
7.1. O-vortaj frazpartoj ... 59
7.2. A-vortaj frazpartoj ... 64
7.3. E-vortaj frazpartoj ... 65

**8. Unu-nombro kaj multe-nombro** ... **67**
8.1. Bazaj reguloj por nombro ... 67
8.2. Uzado de unu-nombro kaj multe-nombro ... 67
8.2.1. Nombro ĉe radikoj kaj kunmetaĵoj ... 67
8.2.2. Nombro ĉe O-vortoj ... 68
8.2.3. Nombro ĉe A-vortoj kaj A-vortecaj vortetoj ... 70
8.2.4. Nombro – specialaj okazoj ... 73

**9. Difiniloj** ... **77**
9.1. Difina artikolo – *la* ... 77
9.1.1. *La* – bazaj reguloj ... 77
9.1.2. *La* – individuaĵoj ... 78
9.1.3. *La* – konateco ... 80
9.1.4. *La* – specoj ... 83
9.1.5. *La* – specialaj uzoj ... 85
9.1.6. *La* ĉe propraj nomoj ... 88
9.2. Aliaj difiniloj ... 95
9.3. Pli ol unu difinilo ... 98

**10. Apostrofo......101**
10.1. Normala apostrofado......101
10.2. Nenormala apostrofado......103
**11. Pronomoj......105**
11.1. Personaj pronomoj......105
11.2. Posedaj pronomoj......106
11.3. Unua persono......107
11.4. Dua persono......108
11.5. Tria persono......109
11.6. *Si*......115
11.6.1. *Si* en simplaj frazoj......116
11.6.2. *Si* en kompleksaj frazoj......118
11.6.3. *Si* en fiksitaj esprimoj......126
**12. Rolmontriloj......127**
12.1. Frazroloj sen rolmontrilo......127
12.1.1. Subjekto......127
12.1.2. Alvoko......128
12.1.3. Perverba priskribo......129
12.1.4. Identiga priskribo......129
12.2. La rolfinaĵo N......130
12.2.1. N – bazaj reguloj......130
12.2.2. N por objekto......131
12.2.3. N por mezuro......135
12.2.4. N por tempopunkto......138
12.2.5. N por direkto......139
12.2.6. N anstataŭ *je*......143
12.3. Rolvortetoj......144
12.3.1. *Je*......145
12.3.2. *De*......147
12.3.2.1. *De* rilate al verbo......148
12.3.2.2. *De* rilate al aga O-vorto......150
12.3.2.3. *De* rilate al ne-aga O-vorto......151
12.3.2.4. *De* rilate al participo......154
12.3.2.5. *De* rilate al A-vorto aŭ E-vorto......155
12.3.2.6. *De* rilate al vorteto......156
12.3.3. *Da*......157
12.3.3.1. *Da* – bazaj reguloj......157
12.3.3.2. *Da* – detalaj reguloj......158
12.3.3.3. *Da* – nekutimaj uzoj......161
12.3.4. Lokaj rolvortetoj......163
12.3.4.1. *Antaŭ* (kaj *malantaŭ*)......163
12.3.4.2. *Apud*......166
12.3.4.3. *Ĉe*......167
12.3.4.4. *Ĉirkaŭ*......169
12.3.4.5. *Ekster*......171
12.3.4.6. *En*......172
12.3.4.7. *Inter*......175
12.3.4.8. *Kontraŭ*......179
12.3.4.9. *Post*......183
12.3.4.10. *Preter*......185
12.3.4.11. *Sub*......186
12.3.4.12. *Super*......188

12.3.4.13. *Sur* ........ 190
12.3.4.14. *Tra* ........ 193
12.3.4.15. *Trans* ........ 194
12.3.5. Direktaj rolvortetoj ........ 196
12.3.5.1. *Al* ........ 196
12.3.5.2. *El* ........ 201
12.3.5.3. *Ĝis* ........ 203
12.3.6. Aliaj rolvortetoj ........ 206
12.3.6.1. *Anstataŭ* ........ 206
12.3.6.2. *Dum* ........ 208
12.3.6.3. *Krom* ........ 209
12.3.6.4. *Kun* ........ 212
12.3.6.5. *Laŭ* ........ 216
12.3.6.6. *Malgraŭ* ........ 218
12.3.6.7. *Per* ........ 218
12.3.6.8. *Po* ........ 221
12.3.6.9. *Por* ........ 223
12.3.6.10. *Pri* ........ 228
12.3.6.11. *Pro* ........ 229
12.3.6.12. *Sen* ........ 231
12.3.7. Rolvortaĵoj ........ 231
12.3.8. Memstaraj rolvortetoj ........ 234
12.3.9. Forlaso de rolvorteto ........ 234

**13. Tabelvortoj ........ 237**
13.1. Tabelvortoj – bazaj reguloj ........ 237
13.2. Tabelvortaj postpartoj kaj ordinaraj finaĵoj ........ 240
13.3. Ĉu ALI-vortoj povas esti tabelvortoj? ........ 241

**14. E-vortecaj vortetoj ........ 245**
14.1. E-vortecaj vortetoj lokaj ........ 245
14.1.1. Tabelvortoj je E ........ 245
14.1.2. *Ĉi* ........ 247
14.1.3. *For* ........ 250
14.2. E-vortecaj vortetoj tempaj ........ 251
14.2.1. Tabelvortoj je AM ........ 251
14.2.2. *Ankoraŭ* ........ 254
14.2.3. *Baldaŭ* ........ 255
14.2.4. *Hodiaŭ*, *hieraŭ*, *morgaŭ* ........ 255
14.2.5. *Jam* ........ 258
14.2.6. *Ĵus* ........ 260
14.2.7. *Nun* ........ 261
14.2.8. *Plu* ........ 263
14.2.9. *Tuj* ........ 265
14.3. E-vortecaj vortetoj ceteraj ........ 265
14.3.1. Tabelvortoj je AL ........ 265
14.3.2. Tabelvortoj je EL ........ 267
14.3.3. Tabelvortoj je OM ........ 272
14.3.4. *Ajn* ........ 276
14.3.5. *Almenaŭ* ........ 277
14.3.6. *Ankaŭ* ........ 278
14.3.7. *Apenaŭ* ........ 279
14.3.8. *Do* ........ 280
14.3.9. *Eĉ* ........ 281

14.3.10. *Ja*.....281
14.3.11. *Jen*.....281
14.3.12. *Kvazaŭ*.....283
14.3.13. *Mem*.....284
14.3.14. *Nur*.....285
14.3.15. *Pli, plej*.....287
14.3.16. *Preskaŭ*.....292
14.3.17. *Tamen*.....292
14.3.18. *Tre*.....293
14.3.19. *Tro*.....294

**15. O-vortecaj kaj A-vortecaj vortetoj.....297**
15.1. Tabelvortoj je U.....297
15.2. Tabelvortoj je O.....302
15.3. Tabelvortoj je A.....307
15.4. Tabelvortoj je ES.....309
15.5. *Ambaŭ*.....311
15.6. Liternomoj.....312

**16. Kunligaj vortetoj.....315**
16.1. *Kaj*.....315
16.2. *Aŭ*.....317
16.3. *Sed*.....320
16.4. *Plus* kaj *minus*.....322
16.5. Vortostumpoj.....323

**17. Kombinitaj vortetoj.....325**
17.1. *Aŭ ... aŭ*.....325
17.2. *Ĉu ... ĉu*.....325
17.3. *Jen ... jen*.....326
17.4. *Ju ... des*.....326
17.5. *Kaj ... kaj*.....328
17.6. *Nek ... nek*.....328

**18. Ekkriaj vortetoj kaj sonimitoj.....329**
18.1. Oficialaj ekkriaj vortetoj.....329
18.2. Ordinaraj radikoj kiel ekkriaj vortetoj kaj sonimitoj.....331
18.3. Neoficialaj ekkriaj vortetoj kaj sonimitoj.....331
18.4. Elparolado kaj skribado de ekkriaj vortetoj kaj sonimitoj.....333

**19. Neoficialaj vortetoj.....335**

**20. Komparaj esprimoj.....339**
20.1. *Kiel* kaj *ol*.....339
20.1.1. Uzado de *kiel* kaj *ol*.....339
20.1.2. *Kiel* kaj *ol* kune kun rolmontriloj.....341
20.1.3. *Kiel* por rolo, funkcio k.s.....344
20.1.4. Komparaj esprimoj – ĉu mallongigitaj frazoj?.....346
20.1.5. *Tiel same kiel, same kiel, samkiel*.....347
20.2. Aliaj montriloj de komparo.....348

**21. Neado.....351**

**22. Demandoj kaj respondoj.....355**
22.1. KI-demandoj.....355
22.2. *Ĉu*-demandoj.....355
22.3. Demandoj sen demandovorto.....356
22.4. Respondvortoj.....357

**23. Nombroj ......................................................................................................363**
23.1. Nombraj vortetoj ...............................................................................363
23.1.1. Nombraj vortetoj – formoj ..................................................363
23.1.2. Nombraj vortetoj – uzado ...................................................365
23.1.3. Specialaj uzoj de *unu* ............................................................367
23.2. O-vortaj nombrovortoj ......................................................................372
23.3. Miksitaj nombroj ...............................................................................374
23.4. A-vortaj nombrovortoj ......................................................................375
23.5. E-vortaj nombrovortoj ......................................................................377
23.6. Nuanciloj de nombraj kaj kvantaj vortoj .........................................377
23.7. Matematikaj esprimoj .......................................................................381
23.8. Horoj .................................................................................................383
23.9. Datoj .................................................................................................384

**24. Kvantaj vortoj .............................................................................................387**
24.1. Kvantaj O-vortoj ...............................................................................387
24.2. Kvantaj A-vortoj ...............................................................................387
24.3. Kvantaj E-vortoj ...............................................................................388
24.4. Kvantaj vortetoj ................................................................................390
24.5. Grado kaj kvanto ...............................................................................391

**25. Specialaj priskriboj ......................................................................................395**
25.1. Perverba priskribo .............................................................................395
25.1.1. Perverba priskribo de subjekto ............................................395
25.1.2. Perverba priskribo de objekto ..............................................400
25.2. Identiga priskribo ..............................................................................404
25.3. Apudmeto ..........................................................................................405

**26. Verboj ...........................................................................................................411**
26.1. Neŭtrala modo – I-finaĵo ..................................................................411
26.2. Reala modo .......................................................................................411
26.2.1. Nun-tempo – AS-finaĵo .......................................................412
26.2.2. Pasinta tempo – IS-finaĵo ....................................................412
26.2.3. Venonta tempo – OS-finaĵo .................................................413
26.3. Vola modo – U-finaĵo .......................................................................414
26.4. Imaga modo – US-finaĵo ..................................................................415

**27. I-verboj .........................................................................................................417**
27.1. I-verboj – bazaj reguloj .....................................................................417
27.2. I-verboj kiel subjekto ........................................................................418
27.3. I-verboj en aliaj frazroloj ..................................................................419
27.3.1. I-verboj kune kun *povi*, *devi* kaj *voli* .................................419
27.3.2. I-verboj kune kun aliaj verboj ..............................................420
27.3.3. I-verboj kun alia subjekto ....................................................421
27.3.4. I-verboj – ŝajne pluraj objektoj ...........................................423
27.4. I-verboj kiel rekta priskribo ..............................................................424
27.5. I-verboj kun rolvortetoj .....................................................................425
Aliaj rolvortetoj ..................................................................................428
27.6. I-verboj kvazaŭ ĉefverboj ..................................................................431
27.7. I-verboj kaj agaj O-vortoj ..................................................................432

**28. Participoj ......................................................................................................435**
28.1. Participoj kiel A-vortoj ......................................................................435
28.2. Participoj kiel E-vortoj ......................................................................437
28.3. Participoj kiel O-vortoj ......................................................................439
28.4. Kunmetitaj verboformoj ....................................................................441

28.4.1. Kunmetitaj verboformoj aktivaj ..... 442
28.4.2. Kunmetitaj verboformoj pasivaj ..... 444
28.4.3. Nekutimaj kunmetitaj verboj ..... 446

**29. Pasivo ..... 449**
29.1. Pasivo – bazaj reguloj ..... 449
29.2. Pasivo – participelekto ..... 451
29.2.1. Elekto de pasiva participo – bazaj principoj ..... 451
29.2.2. Elekto de pasiva participo – specialaj okazoj ..... 452
29.2.3. Atismo ..... 453
29.3. Pasivigeblaj frazoj ..... 454

**30. Verboj kaj frazroloj ..... 457**
30.1. Sensubjektaj verboj ..... 457
30.2. Senobjektaj verboj ..... 458
30.3. Objektaj verboj ..... 458
30.4. Verboj kun *al*-komplemento ..... 459
30.5. Priskribaj verboj ..... 460
30.6. Similsignifaj verboj ..... 460
30.7. Alternativaj frazkonstruoj ..... 461
30.8. IG-verboj ..... 462
30.9. IĜ-verboj ..... 464
30.10. *Pri*-verboj ..... 468
30.11. Kompleksaj verboj ..... 468

**31. Kelkaj gravaj verboj ..... 469**
31.1. *Esti* ..... 469
31.2. *Fariĝi* kaj *iĝi* ..... 471
31.3. *Havi* ..... 471
31.4. *Fari* ..... 472
31.5. *Igi* ..... 473
31.6. *Lasi* ..... 474
31.7. *Povi*, *devi* kaj *voli* ..... 476
31.7.1. *Povi* ..... 476
31.7.2. *Devi* ..... 477
31.7.3. *Voli* ..... 478
31.7.4. Neado de *povi*, *devi* kaj *voli* ..... 479
31.7.5. *Povus*, *devus* kaj *volus* ..... 481
31.8. *Komenci*, *fini*, *daŭrigi*, *ĉesi* ..... 482

**32. Frazospecoj ..... 485**
32.1. Fraztipoj kaj frazfunkcioj ..... 485
32.2. Kompleksaj frazoj ..... 487
32.3. Mallongigitaj frazoj ..... 488

**33. Subfrazoj ..... 493**
33.1. Kio estas subfrazo? ..... 493
33.2. *Ke*-frazoj ..... 494
33.2.1. *Ke*-frazoj kiel subjekto ..... 494
33.2.2. *Ke*-frazoj kiel objekto ..... 495
33.2.3. *Ke*-frazoj kiel komplemento ..... 496
33.2.4. *Ke*-frazoj kiel priskribo ..... 497
33.2.5. Motivantaj kaj rezultaj *ke*-frazoj ..... 499
33.2.6. Forlaso de *ke* ..... 499
33.2.7. Verboformoj en *ke*-frazoj ..... 499
33.3. Demandaj subfrazoj ..... 503

33.4. Rilataj subfrazoj .......... 506
33.4.1. Rilataj *kiu*, *kio* kaj *kies* .......... 506
33.4.1.1. Rilata *kiu* .......... 506
33.4.1.2. Rilata *kio* .......... 511
33.4.1.3. Rilata *kies* .......... 514
33.4.2. Aliaj rilataj KI-vortoj .......... 516
33.4.3. Rilataj subfrazoj – forlaso de TI-vorto .......... 520
33.5. *Se*-frazoj .......... 523
*Se* antaŭ I-verbo .......... 524
33.6. *Ĉar*-frazoj .......... 525
33.7. Aliaj subfrazoj – *apenaŭ*, *dum*, *ĝis*, *kvankam*, *kvazaŭ*, *ol* .......... 526
33.8. Nerekta parolo .......... 531
33.8.1. Verboformoj en nerekta parolo .......... 531
33.8.2. Tempaj kaj lokaj vortoj en nerekta parolo .......... 534
33.8.3. Pronomoj en nerekta parolo .......... 535

**34. Vortordo .......... 537**
34.1. Ordo de frazpartoj .......... 537
34.2. Antaŭmetado de frazparto .......... 538
34.2.1. Normala antaŭmetado .......... 538
34.2.2. Antaŭmetado el subfrazo .......... 539

**35. Propraj nomoj .......... 543**
35.1. Nomspecoj .......... 543
35.2. Ne-esperantigitaj nomoj .......... 543
35.3. Esperantigitaj nomoj .......... 545
35.4. Landoj, popoloj kaj lingvoj .......... 548
35.5. Majuskloj kaj minuskloj ĉe propraj nomoj .......... 555

**36. Citaĵoj .......... 559**

**Vortfarado .......... 563**

**37. Vortfaraj principoj .......... 563**
37.1. Vortelementoj kaj signifoj .......... 563
37.2. Vortklasaj finaĵoj .......... 566
37.2.1. O-finaĵo .......... 566
37.2.2. A-finaĵo .......... 566
37.2.3. E-finaĵo .......... 571
37.2.4. Verbaj finaĵoj .......... 572
37.3. Precizigaj antaŭelementoj .......... 573
37.4. Vortigo de frazetoj .......... 580
37.5. Streĉitaj formoj .......... 584
37.6. Ŝajnaj kunmetaĵoj .......... 585

**38. Afiksoj .......... 587**
38.1. Kio estas afikso? .......... 587
38.2. Sufiksoj .......... 588
38.2.1. AĈ .......... 588
38.2.2. AD .......... 588
38.2.3. AĴ .......... 590
38.2.4. AN .......... 592
38.2.5. AR .......... 593
38.2.6. ĈJ .......... 594
38.2.7. EBL .......... 595
38.2.8. EC .......... 596
38.2.9. EG .......... 599

38.2.10. EJ....600
38.2.11. EM....602
38.2.12. END....604
38.2.13. ER....604
38.2.14. ESTR....605
38.2.15. ET....606
38.2.16. ID....607
38.2.17. IG....608
38.2.18. IĜ....612
38.2.19. IL....615
38.2.20. IN....618
38.2.21. IND....619
38.2.22. ING....620
38.2.23. ISM....621
38.2.24. IST....623
38.2.25. NJ....625
38.2.26. OBL....625
38.2.27. ON....627
38.2.28. OP....628
38.2.29. UJ....629
38.2.30. UL....631
38.2.31. UM....633
38.3. Prefiksoj....635
38.3.1. BO....635
38.3.2. ĈEF....636
38.3.3. DIS....637
38.3.4. EK....638
38.3.5. EKS....639
38.3.6. GE....640
38.3.7. MAL....643
38.3.8. MIS....646
38.3.9. PRA....647
38.3.10. RE....648
38.4. Afiksecaj elementoj....649
38.4.1. Afiksecaj radikoj kaj kunmetaĵoj....649
38.4.2. Afiksecaj rolvortetoj....653
38.4.3. Aliaj afiksecaj vortetoj....657

**39. Neoficialaj afiksoj....661**
39.1. Neoficialaj sufiksoj....662
39.1.1. AB°....662
39.1.2. AC....662
39.1.3. AL....662
39.1.4. ANC....663
39.1.5. ARI°....663
39.1.6. ATOR (kaj ADOR°)....663
39.1.7. E°....663
39.1.8. ED....664
39.1.9. EN....664
39.1.10. ENZ°....664
39.1.11. ESK....664
39.1.12. I....664
39.1.13. IĈ°....666
39.1.14. IF°....666

39.1.15. IK....667
39.1.16. ILION....668
39.1.17. ILIARD....668
39.1.18. IP°....668
39.1.19. ISTAN°....668
39.1.20. IT....669
39.1.21. IV....669
39.1.22. IZ....669
39.1.23. J° kaj PJ°....670
39.1.24. NOMIAL....670
39.1.25. OFON°....670
39.1.26. OID (kaj OJD°)....671
39.1.27. OL....671
39.1.28. OLOG....671
39.1.29. OLOGI....672
39.1.30. OMETR°....672
39.1.31. OMETRI°....672
39.1.32. OTEK°....672
39.1.33. OZ....673
39.1.34. T....673
39.1.35. TET....673
39.1.36. UK°....674
39.2. Neoficialaj prefiksoj....674
39.2.1. AFRO°....674
39.2.2. ANTI....674
39.2.3. ARĤI/ARKI....674
39.2.4. AŬDIO°....675
39.2.5. AŬTO°....675
39.2.6. BIO....675
39.2.7. DES....675
39.2.8. EKO....676
39.2.9. EŬRO°....676
39.2.10. HIPER....676
39.2.11. INFRA....676
39.2.12. KO....677
39.2.13. KVER....677
39.2.14. MAKRO....677
39.2.15. META....677
39.2.16. MIKRO....677
39.2.17. MINI....678
39.2.18. MONO....678
39.2.19. PRE....678
39.2.20. PROTO....679
39.2.21. PSEŬDO....679
39.2.22. RETRO....679
39.2.23. SAN....679
39.2.24. SEMI (kaj HEMI)....680
39.2.25. STIF°....680
39.2.26. TELE....680
39.2.27. TERMO....680
39.2.28. ULTRA....680
39.2.29. VIDEO°....681
39.3. Internaciaj afiksoj....681

**Aldonoj** ... **685**
- **40. Gramatiko en la *Fundamento*** ... **685**
- **41. Parencoj kaj familianoj** ... **691**
- **42. Simboloj kaj mallongigoj** ... **695**
- **43. Listo de ne-PIV-aj elementoj** ... **697**
- **44. Gramatika vortareto** ... **705**
- **45. Pri la gramatikaj terminoj en *PMEG*** ... **713**
- **46. Literaturo** ... **717**

**Indekso** ... **725**

# Enkonduko

La *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (= *PMEG*) estas verko por ordinaraj esperantistoj, kiuj volas detale studi la gramatikon, vortfaradon, skribon kaj elparolon de la Internacia Lingvo. Ĝi estas unuavice praktika lernilo, kvankam ankaŭ lingvistoj povas trovi ĝin utila.

La mallongigon *PMEG* multaj elparolas kiel “pomego”.

*PMEG* provas klarigi la lingvon en facila maniero. Ĝi tial uzas netradiciajn gramatikajn esprimojn (§44), kiuj estas espereble pli facilaj ol la tradiciaj vortoj. Eĉ tiaj kutimaj vortoj kiel *akuzativo*, *substantivo* kaj *prepozicio* forestas. Anstataŭe *PMEG* parolas pri *N-finaĵo*, *O-vorto* kaj *rolvorteto*. Tio ne signifas, ke la tradiciaj vortoj estas malbonaj. Ili nur ne estas bezonataj en *PMEG*. Pri la kialoj, ke mi uzas tiajn netradiciajn terminojn, mi parolas aparte en la aldono **Pri la gramatikaj terminoj en *PMEG*** (§45).

*PMEG* klarigas kaj la plej bazajn aferojn, kaj tre specialajn detalojn. Ĝi provas forlasi la kutiman eŭropan perspektivon de multaj lernolibroj. Tial *PMEG* enhavas detalajn klarigojn de multaj aferoj, kiuj por iuj eŭropanoj eble ŝajnas memkompreneblaj.

*PMEG* traktas kaj modernan kaj klasikan lingvouzon. Ĝi uzas por helpi al la klarigoj abundon da ekzemploj, inter kiuj estas multege da ekzemploj el la *Fundamento* kaj la verkaro de Zamenhof. Ĉe ĉiu tia ekzemplo la preciza fontloko estas montrata per mallongigo. Vidu tiurilate precipe la liston de literaturo (§46).

Esence *PMEG* estas konservema verko, kiu multloke defendas la Fundamentan kaj zamenhofan lingvaĵon kontraŭ diversaj reformemaj ideoj kaj uzoj, sed ĝi ankaŭ prezentas modernajn uzojn kaj evoluojn, eĉ tiajn, kiujn iuj eble opinias tro drastaj.

## Dankoj

Pri la enhavo de *PMEG* respondecas nur mi sola, sed helpis min multaj personoj. Precipe kontribuis per valoregaj konsiloj *Jorge Camacho*, *Markos Kramer*, *Birke Dockhorn*, Nikolao *Killing-Günkel*, *Hosomi Kazuyuki*, *Alen Kris*, *Jouko Lindstedt*, Francisko *Lorrain*, *Ken Miner*, *Rob Moerbeek*, *Derek Roff*, *Robin van der Vliet* kaj *Simon Davies*. Pri matematikaj terminoj konsilis profesoro *Christer Kiselman*. Krome kontribuis multaj aliaj esperantistoj per nemalhaveblaj kritiko kaj proponoj. Pri la ellaborado de la unua HTML-a versio ege helpis min *Stellan Lagerström* kaj *Per Aarne Fritzon*. Al ĉiuj mi kore dankas.

Mi volas aparte danki al E@I, kiu eldonis *PMEG*-on 2020, al Katerina Miri Lozina, kiu fasonis la novan kovrilon, kaj ankaŭ al Esperanto-USA (antaŭe la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko – ELNA), kiu realigis la unuan paperlibran eldonon de *PMEG* en la jaro 2005.

Fine mi ŝuldas tute specialan kaj grandegan dankon al ĉiuj, kiuj subtenis min en mia amasfinancada kampanjo ĉe LiberaPay <*https://eo.liberapay.com/Bertilo/*> aŭ tra aliaj kanaloj.

### PMEG en la Interreto

La interreta versio de *PMEG* troviĝas ĉe <*https://bertilow.com/pmeg/*>.

Liston de ŝanĝoj faritaj en la diversaj versioj de PMEG (ekde la 3-a de Majo 2018) vi trovos ĉe <*https://bertilow.com/pmeg/shanghoj.html*>

Bertilo *Wennergren*

# Skribo kaj elparolo

## 1. Skribo

### 1.1. Literoj

Esperanto uzas varianton de la latina alfabeto. Tiu varianto enhavas 28 literojn. Ĉiu litero ekzistas en du formoj: majusklo (granda litero, ĉeflitero) kaj minusklo (malgranda litero):

| | |
|---|---|
| **Majuskloj:** | A, B, C, Ĉ, D, E, F, G, Ĝ, H, Ĥ, I, J, Ĵ, K,<br>L, M, N, O, P, R, S, Ŝ, T, U, Ŭ, V, Z |
| **Minuskloj:** | a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k,<br>l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z |
| **Nomoj:** | *a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko,*<br>*lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo* |

La ĉi-antaŭan vicordon de la literoj oni uzas por ordigi vortojn en vortaroj, nomojn en listoj de partoprenantoj, kaj en multaj similaj okazoj. Legu ankaŭ pri alfabeta ordigo de ne-Esperantaj literoj en §1.2.

Legu pli detale pri la liternomoj en §15.6, kaj pri elparolo de mallongigoj en §2.2. Legu ankaŭ pri ne-Esperantaj literoj en §1.2.

#### Majuskloj kaj minuskloj

Ordinare oni uzas la minusklajn literformojn. Majusklojn oni uzas kiel unuan literon de ĉefa frazo, kaj kiel unuan literon de propra nomo, kaj en iuj mallongigoj (§2.2).

ONI IAFOJE SKRIBAS NUR PER MAJUSKLOJ, EKZEMPLE EN TITOLOJ AŬ POR EMFAZI.

okaze oni vidas tekstojn, kiuj uzas nur minusklojn. tio povas esti ekz. stila efekto. kelkaj eĉ eksperimente uzas nur minusklojn en ĉiaj tekstoj.

Iafoje majuskloj estas uzataj por montri respekton, ekz. en la vorto *Dio*. La pronomon *Vi* Zamenhof ofte skribis kun komenca majusklo (ekz. en leteroj), sed tio estas nun malofta.

Ne ekzistas devigaj reguloj pri la uzo de majuskloj kaj minuskloj. Legu tamen pri la uzo de majuskloj ĉe propraj nomoj en §35.5.

Iafoje oni renkontas la ideon, ke la litero Ŭ ne havas majusklan formon. Tiu ideo baziĝas sur la fakto, ke Ŭ ne povas aperi vortkomence en Esperanta vorto (§2.1), sed kiam oni ekz. skribas tutajn vortojn majuskle, oni devas uzi ankaŭ majusklajn Ŭ (vidu la ĉi-antaŭan ekzemplon).

**Noto:** Kiam oni parolas pri tio, ĉu litero havas sian minusklan aŭ sian majusklan formon, oni iafoje uzas la vortojn **uskleco** kaj **usklo** (= minusklo aŭ majusklo).

### Supersignoj

Ses literoj estas unikaj por Esperanto: **Ĉ, Ĝ, Ĥ, Ĵ, Ŝ** kaj **Ŭ**. Ili havas supersignojn. La supersigno ^ nomiĝas **cirkumflekso** aŭ **ĉapelo**. La supersigno super U nomiĝas **hoketo**.

### Alternativoj al la Esperantaj supersignoj

Por tiaj okazoj, en kiuj ne eblas uzi la ĝustajn supersignojn, la *Fundamento* (§40) difinis alternativan anstataŭan skribmanieron. En tiu skribo oni uzas postmetitan **H** anstataŭ la cirkumfleksoj, kaj oni tute forlasas la hoketon super **Ŭ**: **ch, gh, hh, jh, sh, u**. Ekzemple: *Chiu brancho estis kvazau vasta florricha herbejo au plej charma ghardeno. = Ĉiu branĉo estis kvazaŭ vasta florriĉa herbejo aŭ plej ĉarma ĝardeno.* [FA3.114]

En komputila tekstolaboro, en retpoŝto, k.s., iuj uzas postmetitan ikson, **X**, anstataŭ cirkumflekso kaj hoketo: **cx, gx, hx, jx, sx, ux**. Ekzemple: *Cxiu brancxo estis kvazaux vasta florricxa herbejo aux plej cxarma gxardeno.*

Iafoje oni uzas aliajn supersignojn laŭ la ebloj, ekz. ´ (dekstrakorna supersigno, akuta supersigno), kaj ` (maldekstrakorna supersigno, malakuta supersigno).

Kiam oni skribas Esperanton per brajla skribo (skribo por blinduloj), oni uzas specialajn brajlajn kodaĵojn por la supersignaj Esperantaj literoj.

Nur kiam la cirkonstancoj ne permesas uzi la normalajn supersignojn, kaj kiam pro apartaj bezonoj la Fundamenta H-skribo (klarigita ĉi-antaŭe) ne estas oportuna, oni povas anstataŭigi la supersignajn literojn per aliaj signoj aŭ signokombinoj.

## 1.2. Helposignoj

Krom literoj (§1.1) oni uzas ankaŭ helposignojn. Ne ekzistas devigaj reguloj pri ilia uzado en Esperanto. Tial ili estos ĉi tie nur supraĵe klarigitaj.

### Ne-elparolataj helposignoj

**Spaceto** estas uzata inter vortoj. Spacetoj normale ne respondas al paŭzoj en la parolo, sed montras lokojn, kie oni povus paŭzi, se oni volus. Ne metu spacetojn antaŭ punkto, demandosigno, krisigno, komo, dupunkto, punktokomo, tripunkto kaj apostrofo.

. **Punkto** estas uzata por montri la finon de ĉeffrazo. Oni uzas punktojn ankaŭ en mallongigoj, ekz. *k.t.p.* = "kaj tiel plu" (sed *ktp* estas same bona). Oni povas uzi punktojn por klariga disigado de ciferoj en altaj nombroj, ekz.: *10.000.000.000* (= "dek miliardoj"), sed estas pli bone uzi (se eble) mallarĝajn spacetojn, ekz.: *10 000 000 000*. Iafoje oni uzas punkton anstataŭ vicorda A-finaĵo en datoj (§23.9), ekz. *12. Majo* = "la dek-dua (tago) de Majo". Ne uzu punkton antaŭ decimaloj en nombroj. Por tiu celo oni uzu komon. Legu pli pri matematikaj esprimoj en §23.7. Krome punktoj estas uzataj kiel disigaj signoj en diversspecaj numeroj (kie ne temas pri decimaloj), en nomoj de komputilaj dosieroj, en retadresoj k.s.: *versio 3.2.4* (de programo), *dokumento.txt*, *www.uea.org*.

? **Demandosigno** estas uzata post demandaj ĉeffrazoj (§32.1) anstataŭ punkto: *Kion vi volas?* Ne uzu demandosignon post demanda subfrazo (§33.3). Oni ne metas demandosignon komence de frazo (male al la hispana lingvo).

! **Krisigno** estas uzata post ordonaj frazoj (§32.1) kaj emfazaj frazoj anstataŭ punkto: *Ne faru tion!* Oni ne metas krisignon komence de frazo (male al la hispana lingvo).

, **Komo** estas uzata ene de frazoj en lokoj, kie povas esti nature iom paŭzi, ekz. antaŭ subfrazo: *Li diris, ke li amas ŝin. Mi vidis virinon, kiu portis paketon.* Oni uzas komojn ankaŭ anstataŭ la vortoj *kaj* kaj *aŭ* (§16) en elnombrado de pluraj aferoj: *Ili manĝis legomojn, panon, fromaĝon kaj fruktojn.* Komoj estas ankaŭ uzataj inter kunligitaj ĉeffrazoj: *Ili manĝis, sed ili ne satiĝis*. Krome oni uzas komon antaŭ decimaloj en nombroj: *3,14* (= "tri komo unu kvar"). Legu pli pri matematikaj esprimoj en §23.7.

: **Dupunkto** montras, ke sekvas detala prezento: *Li diris: "Mi amas ŝin"* (rekta citaĵo); *Jen la menuo: legomoj, pano, fromaĝo kaj fruktoj* (elnombrado); *La konkludo estas: Li estas kulpa!*

; **Punktokomo** estas iafoje uzata anstataŭ punkto aŭ komo inter ĉeffrazoj, kiuj iel kunapartenas; iafoje anstataŭ komo en elnombradoj, kie la elnombrataj aferoj ne estas unuopaj vortoj, sed plurvortaĵoj. Punktokomo disigas pli forte ol komo, sed malpli forte ol punkto. Ĉeffrazo post punktokomo normale komenciĝas per minusklo.

... **Tripunkto** estas uzata anstataŭ punkto post nefinitaj frazoj, aŭ kie io estas ellasita, aŭ kie oni deziras iom longan paŭzon.

- **Dividostreko** estas iafoje uzata inter la partoj de kun-metita vorto por faciligi la vorto-komprenon, kaj por tranĉi vorton fine de linio. Tia uzo de dividostreko ne ŝanĝas la sencon de vorto: *kafo-tablo = kafotablo*. Dividostreko aperas ankaŭ en vortoj kiel *Nov-Jorko* (ĉar *NovJorko* kun majusklo tuj post minusklo aspektas iom strange, sed eblas ankaŭ *Novjorko*), kaj en *23-a*, *15-ono* k.s. (inter cifero kaj litero, sed ankaŭ *23a* estas tute bona skribo-maniero). Oni ankaŭ uzas dividostrekojn en iaj mallongigoj por montri, kie mankas literoj ene de vorto: *d-ro* (= “doktoro”), *s-ro* (= “sinjoro”). Iafoje oni uzas dividostrekojn en propranomaj radikoj, ĉar la origina nomformo konsistas el pluraj vortoj: *San Francisco → San-Francisko* (aŭ *Sanfrancisko*), *Sierra Leone → Siera-Leono* (aŭ *Sieraleono*), *San Marino → San-Marino* (aŭ *Sanmarino*), *La Paz → La-Pazo* (aŭ *Lapazo*), *Nova Scotia → Nova-Skotio°* (aŭ *Novaskotio*). Tiaj Esperantaj formoj estu do rigardataj kiel nekunmetitaj en Esperanto malgraŭ la dividostrekoj. Skribo sen dividostreko estas tamen preferinda. Legu ankaŭ pri dividostrekoj en kunskriboj en §25.3. Dividostreko aspektas plimalpli same kiel minus-signo, kaj tre similas al ĝis-streko kaj haltostreko, kiuj tamen estas pli longaj (en bona tipografio).

— **Haltostreko** estas uzata — kiel memstara signo — anstataŭ komo por montri paŭzon, anstataŭ krampo por montri parentezon, kaj antaŭ nova repliko en dialogo. Haltostreko aspektas simile al dividostreko, minus-signo kaj ĝis-streko, sed en preciza tipografio ĝi estu pli longa. Inter haltostreko kaj apuda vorto estu spaceto.

( ) **Krampoj** estas uzataj antaŭ kaj post parentezo (intermetita klarigo aŭ komento). Oni parolas pri **komenca krampo** aŭ **ek-krampo**, kaj **ferma krampo** aŭ **finkrampo**. Alternativaj formoj estas krampoj **rondaj** (komento), **rektaj** [komento], **angulaj** <komento>, kaj **kunigaj** {komento}. Oni ne metu spacetojn inter krampoj kaj komento. Ne skribu do: ( komento ). Oni iafoje uzas anstataŭe haltostrekojn: – komento –. Tiam oni ja uzu spacetojn.

/ **Suprenstreko** estas uzata por dividi alternativojn/elekteblojn (anstataŭ la vorto *aŭ*). Ekzistas ankaŭ **malsuprenstreko**, \, kiu apenaŭ estas uzata en ordinaraj tekstoj.

* **Steleto** aŭ **asterisko** estas uzata post vorto aŭ frazo por signali ion specialan, ekz. por atentigi pri piednoto. En *PMEG* steletoj antaŭ kaj post vorto aŭ frazo (**ekzemplo**) montras, ke la ekzemplo estas erara aŭ tre malrekomendinda.

’ **Apostrofo** montras, ke parto de vorto estas forlasita. Legu detale pri la uzado de apostrofoj en §10.

“ ” **Citiloj** estas uzataj antaŭ kaj post citaĵo, aŭ antaŭ kaj post vorto, kiu ne estas uzata en sia vera signifo. Jen kelkaj alternativaj formoj: “citaĵo”, "citaĵo", „citaĵo”, «citaĵo», »citaĵo«, ‘citaĵo’. Oni ne metu spacetojn inter citiloj kaj citaĵo. Ne skribu do: “ citaĵo ”. Ordinare oni ne elparolas citilojn, sed por aparte atentigi pri la ĉeesto de citiloj en teksto, kelkaj elparolas komencan citilon kiel *cit*, kaj finan citilon kiel *malcit*. Pli klare estas diri *citaĵo – fino de citaĵo* aŭ simile.

### Streketoj

En la frua tempo de Esperanto oni uzis diversaspektajn **streketojn** inter la partoj de kunmetitaj vortoj por helpi al komencantoj: *vapor|ŝip|o* [FG.55]. Tio povas ankoraŭ aperi en bazaj lernolibroj, sed en ordinaraj tekstoj oni ne plu uzas tiajn streketojn. Multaj ekzemploj de tiaj streketoj troviĝas en la sekcio Gramatiko en la *Fundamento* (§40). Iafoje oni konfuzas tiajn streketojn kun apostrofoj (§10.2).

### Apudiĝo de helposignoj

Helposignoj iafoje apudiĝas, ekz.: ). ”) ’. ’? kaj simile. Tio estas tute en ordo. Iafoje fina punkto de mallongigo renkontiĝas kun komo, krisigno aŭ demandosigno: *Kie vi loĝas, laboras k.t.p.?* Ankaŭ tio estas bona. Sed kiam mallongiga punkto renkontiĝas kun frazofina punkto, oni normale forigas unu el la punktoj: *Ĉi tie mi loĝas, laboras k.t.p.*

## Elparolataj helposignoj

**1 2 3 4 5 6 7 8 9 0** **Ciferoj** (hindaj-arabaj ciferoj) estas simboloj por nombroj (§23.1.1). Iafoje oni uzas anstataŭe romajn ciferojn (I, II, III, IV, V ...), sed la romaj ciferoj ne estas tutmonde konataj, kaj estas evitindaj en Esperanto.

– **Ĝis-streko** estas simbolo por la vorto *ĝis* (§12.3.5.3) normale kunlabore kun *de* (§12.3.2): *Majo–Aŭgusto* (= “de Majo ĝis Aŭgusto”). Ĝis-streko estas (almenaŭ en presitaj tekstoj) pli longa ol dividostreko kaj minus-signo, sed malpli longa ol haltostreko. Kutime oni ne uzas spacetojn antaŭ kaj post ĝis-streko.

− **Minus-signo** estas simbolo por la vorto *minus* (§16.4): *3 − 2* (= “tri minus du”). Minus-signo aspektas pli-malpli same kiel dividostreko, kaj tre similas al ĝis-streko kaj haltostreko, kiuj tamen estas pli longaj (en bona tipografio).

\+ **Plus-signo** estas simbolo por la vorto *plus* (§16.4): *2 + 3* (= “du plus tri”).

= **Egal(ec)o-signo** estas simbolo de egaleco: *k.t.p. = kaj tiel plu* (= “k.t.p. egalas al kaj tiel plu”). Legu pli pri matematikaj esprimoj en §23.7.

| | |
|---|---|
| **&** | **Kaj-signo** estas simbolo por la vorto *kaj*. Ĝi normale ne estas uzata en ordinaraj tekstoj, sed iafoje en nomoj k.s.: *UEA & TEJO* (= "UEA kaj TEJO"). Iafoje oni trovas la mallongigon *k.* (kun aŭ sen punkto) por *kaj*. |
| **§** | **Paragraf-signo** estas simbolo por la vorto *paragrafo*: *§10* (= "paragrafo dek"). |
| **%** | **Procento-signo** aŭ **elcento-signo** estas simbolo por la vorto *procento* (*elcento*), kiu signifas "centono": *100%* (= "cent procentoj/elcentoj"). |

## Ne-Esperantaj literoj

Latinaj ne-Esperantaj literoj povas aperi, kiam oni uzas alilingvajn vortojn en Esperanta teksto, ekz. proprajn nomojn (§35.2). Ili estas uzataj ankaŭ kiel matematikaj kaj alispecaj simboloj.

Jen la kvar plej gravaj ne-Esperantaj latinaj literoj kun siaj Esperantaj nomoj:

**Q q** = *kuo*
**X x** = *ikso*
**Y y** = *ipsilono*
**W w** = *duobla vo*, *ĝermana vo*, *vavo*, *vuo*°

**Noto:** El la kvar nomoj de la litero W, *duobla vo* estas la plej ofte uzata, sed ĝi povas esti miskomprenata kiel efektiva duobla V: *vv*. El la tri malpli oftaj nomoj, *vavo* estas kredeble la plej ofta. Ĝi estas registrita en *PIV* kaj en kelkaj aliaj vortaroj. Rimarku tamen, ke ekzistas hebrea litero, kiu nomiĝas *vav* (§19).

Legu ankaŭ pri elparolado de la literoj Q, X, Y kaj W en §2.3.

Iuj provas uzi la literon **W** kaj iafoje la literon **Y** en Esperantaj vortoj. Tio estas eraro. Esperantaj vortoj povas enhavi nur la 28 Esperantajn literojn (§1.1).

Kiam oni alfabete ordigas vortojn kun ne-Esperantaj latinaj literoj, oni devas iel envicigi tiujn literojn en la Esperantan alfabetan ordon (§1.1). La literojn **q, w, x** kaj **y** oni povas tiam envicigi laŭ iliaj kutimaj pozicioj en latinalfabetaj lingvoj; literojn kun kromsignoj, ekz. **á, è, ö, ç,** k.s. oni povas meti kune kun la respondaj senkromsignaj literoj; ligaĵojn kiel **æ** kaj **œ** oni povas trakti kiel la respondan duliteraĵon; la germanan literon **ß** (*esceto*) oni povas trakti kiel ĝian kutiman anstataŭaĵon **ss**; kaj tiel plu. Laŭ tiuj ĝeneralaj ideoj (kiuj ne solvas ĉiujn problemojn) povas ekesti ekz. la jena vicordo: **a à á â ã ä å æ (= ae), b, c ç, ĉ, d ð, e è é ê ë, f, g, ĝ, h, ĥ, i ì í î ï, j, ĵ, k, l, m, n ñ, o ò ó ô õ ö ø œ (= oe), p, q, r, s ß (= ss), ŝ, t þ (= th), u ù ú û ü, ŭ, v, w, x, y ý ÿ, z**.

Grekaj literoj (§19) estas uzataj en Esperanto nur kiel simboloj en matematiko.

## Vortotranĉado

Kiam oni atingas la finon de skriblinio, oni povas je bezono tranĉi la lastan vorton en du partojn. La unuan parton oni lasas fine de la linio. Post ĝi oni metas dividostrekon. La duan parton oni metas komence de la sekva linio:

> *Ŝin kaptis neforpelebla, nevenk-*
> *ebla revado. Neatenditaj, bril-*
> *antaj perspektivoj kreiĝis antaŭ*
> *ŝiaj okuloj, ŝi ne povis for-*
> *ŝiri de ili sian rigardon, lac-*
> *igitan de la mallumo.*

Ne ekzistas devigaj reguloj pri vortotranĉado en Esperanto. Oni simple tranĉu tiel, ke la rezulto estu facile legebla kaj komprenebla. Multaj tial evitas tranĉojn, kiuj disigas unu solan literon de vorto aŭ vortoparto. Oni ekz. preferas tranĉi "ĉef-urbo" anstataŭ "ĉe-furbo" por ne forigi la solan literon F disde la prefikso ĈEF (§38.3.2), kaj ankaŭ ĉar ofte estas pli klare, se oni tranĉas laŭ la efektivaj signifohavaj vortelementoj. Vidu ankaŭ la klarigojn pri silaboj kaj silabolimoj (§2.2).

# 2. Elparolo

## 2.1. Bazaj elparolaj reguloj

En Esperanto ĉiu litero ĉiam estas elparolata. Ne ekzistas silentaj literoj. La literoj havas po unu bazan elparolon, kiun oni ĉiam povas uzi, sed en la praktiko ĉiu litero varias en sia elparolo.

La literoj A, E, I, O kaj U estas **vokaloj**. Ĉiuj aliaj estas **konsonantoj**.

### Akcento

En vortoj kun du aŭ pli da vokaloj oni elparolas unu vokalon pli forte ol la aliajn. Tiu vokalo havas **akcenton**. Akcento signifas normale plian laŭtecon, sed akcentata vokalo povas ankaŭ esti pli longa, kaj povas havi alian tonon ol la aliaj vokaloj, normale pli altan. Ne ekzistas devigaj reguloj, kiel oni kreu la plifortecon de akcentata vokalo en Esperanto.

La akcento estas ĉiam sur **la antaŭlasta vokalo** (dekstrakornaj supersignoj montras akcenton ĉi tie):

> *t**á**blo*, *nen**í**am*, *rap**í**da*, *taks**í**o*, *famil**í**o*, *revolv**é**ro*, *krokod**í**loj*, *esk**í**mo*, *disk**ú**tas*, *m**é**tro*, *metr**ó**o*, ***á**pud*, *anst**á**taŭ*, *tr**í**cent*, *m**á**lpli*, ***é**kde*, k.t.p.

Rimarku, ke Ŭ kaj J ne estas vokaloj, sed speco de konsonantoj. Oni nomas ilin duonvokaloj.

La finaĵon O oni povas anstataŭigi per apostrofo (§10.1). Apostrofo estas kalkulata kvazaŭ vokalo (neelparolata), kaj la akcento ne ŝanĝiĝas: *taks**í**'*, *famil**í**'*, *revolv**é**r'*, *metr**ó**'*.

Legu ankaŭ pri kromakcentoj en §2.2, silaboj kaj silabolimoj (§2.2), foresto de akcento (§2.2) kaj akcentado de ekkriaj vortetoj kaj sonimitoj (§18.4).

### Vokaloj

Vokalo estas sono, kiu estas farata sen baro de la aerfluo, kaj kiu povas porti akcenton. La voĉkordoj faras tonon (vibrigas la aeron), kaj la lango formas la sonon. La vokaloj diferencas inter si laŭ la pozicio de la lango: laŭ **vasteco** kaj laŭ **antaŭeco**.

#### Vasteco

Esperanta vokalo povas esti:

| | |
|---|---|
| **malvasta** | malgranda malfermaĵo inter la lango kaj la buŝa plafono (I, U) |
| **mezvasta** | mezgranda malfermaĵo (E, O) |
| **vasta** | granda malfermaĵo (A) |

### Antaŭeco

Esperanta vokalo povas esti:

**antaŭa** la malfermaĵo inter la lango kaj la buŝa plafono estas proksima al la dentoj (I, E)

**malantaŭa** la malfermaĵo inter la lango kaj la buŝa plafono estas malproksima de la dentoj (U, O)

La malantaŭaj vokaloj estas preskaŭ ĉiam elparolataj kun rondigitaj lipoj, sed rondeco de la lipoj ne estas grava en Esperanto.

### La kvin vokaloj de Esperanto

| Vokalo | Priskribo | Sonsimbolo laŭ la Internacia Fonetika Alfabeto |
|---|---|---|
| **I** | malvasta antaŭa | `[i]` |
| **U** | malvasta malantaŭa | `[u]` |
| **E** | mezvasta antaŭa | `[e]` |
| **O** | mezvasta malantaŭa | `[o]` |
| **A** | vasta | `[a]` |

Antaŭeco ne gravas ĉe la vokalo A, ĉar ĝi estas la sola vasta vokalo.

### Vokala variado

En lingvo kun nur kvin vokaloj la elparolo povas esti sufiĉe libera. Gravas nur, ke la elparolo de ĉiu vokalo ne fariĝu tro simila al tiu de iu alia el la kvin vokaloj. La ĝusta elparolo de vokalo ne estas preciza loko en la buŝo, sed povas libere varii inter certaj limoj. Se oni elparolas ie inter tiuj limoj, la elparolo estas bona. Sed se oni tro proksimiĝas al la limoj, aŭ transiras ilin, tiam oni riskas miskomprenon. Iaj reguloj pri diversaj variantoj de la vokaloj ne ekzistas, kaj ne estas bezonataj.

> **Noto:** Bedaŭrinde *PAG* rekomendas komplikitajn regulojn pri variantoj de la vokaloj E kaj O. Tiuj rekomendoj estas plene fremdaj al Esperanto kaj tre malfacile lerneblaj. La efektiva lingvouzo ne sekvas ilin.

La longeco de la vokaloj estas en Esperanto tute sensignifa. Oni povas elparoli ilin longe, mezlonge aŭ mallonge, laŭplaĉe. Vokalo, kiu estas akcentata, estas tamen normale elparolata pli longe ol senakcenta vokalo (*simíla*). Sed se sekvas pli ol unu konsonanto, akcenta vokalo ofte ne longiĝas (*rezísti*). Ankaŭ antaŭ C, Ĉ kaj Ĝ multaj elparolas akcentajn vokalojn mallonge (*réĝo*).

La Esperantaj vokaloj ne estas diftongoj. Tio signifas, ke ĉiu Esperanta vokalo estas elparolata "senmove". Oni ne aŭdeble movas la langon de unu pozicio en la buŝo al alia pozicio dum la elparolo de unu vokalo. Ekz. E ne sonu kiel "ej", O ne kiel "oŭ".

Kiam I staras tuj antaŭ alia vokalo, okazas, ke oni elparolas I pli-malpli kiel “ij”: *mia* = “mija”, *liuto* = “lijuto”, *bieno* = “bijeno”. Tia elparolo estas malĝusta, kaj oni provu eviti ĝin, sed kiam miskompreno ne povas okazi (ne ekzistas efektivaj vortoj *mija*, *lijuto* kaj *bijeno*), ĝi tamen povas esti tolerata. Sed oni nepre ne elparolu tian aldonan “j” kun tre forta frota sono (preskaŭ kiel Ĵ), ĉar tiam oni tro malproksimiĝas de la ĝusta elparolo.

## Konsonantoj

Konsonantoj estas sonoj farataj per ia baro de la aerfluo. Ili diferencas inter si laŭ **maniero** (kiel oni baras la aeron), laŭ **loko** (kie en la buŝo oni baras la aeron), kaj laŭ **voĉeco** (ĉu la voĉkordoj vibras aŭ ne).

Tio tamen ne validas por la **duonvokaloj** (Ŭ kaj J). Ili estas vokaloj laŭ la elparola maniero (sen baro de la aerfluo), sed ili estas uzataj kiel konsonantoj.

### Maniero

La Esperantaj konsonantoj estas farataj en sep manieroj:

| | |
|---|---|
| **eksplode** | kompleta baro, kiun oni ekrompas per aerpuŝo (B, P, D, T, G, K) |
| **frote** | nekompleta baro (malvastigo), tra kiu la aero fluas kun frota sono (V, F, Z, S, Ĵ, Ŝ, Ĥ, H) |
| **ekfrote** | kompleta baro, kiun oni ekrompas per aerpuŝo, sed nur tiom, ke la aero povas traflui kun frota sono (C, Ĝ, Ĉ) |
| **naze** | kompleta buŝa baro, la aero iras anstataŭe tra la nazo (M, N) |
| **duonbare** | baro nur en la mezo de la buŝo, la aero fluas libere flanke de la lango (L) |
| **treme** | pluraj sinsekvaj rapidaj baroj kaj rompoj (R) |
| **duonvokale** | mallonga vokala sono uzata kiel konsonanto (J, Ŭ) |

### Loko

La Esperantaj konsonantoj estas farataj en ses lokoj:

| | |
|---|---|
| **lipe** | la du lipoj kune (B, P, M) |
| **lipdente** | la malsupra lipo kontraŭ la supraj dentoj (V, F) |
| **dente** | la lango kontraŭ la karno tuj malantaŭ la supraj dentoj, aŭ kontraŭ la supraj dentoj mem (D, T, Z, S, C, N, L, R) |
| **gingive** | la lango kontraŭ la gingivo iom pli malantaŭe ol la denta pozicio (Ĵ, Ŝ, Ĝ, Ĉ) |
| **vele** | la lango kontraŭ la malantaŭa parto de la buŝa plafono, ĉe la tiel nomata velo (G, K, Ĥ) |
| **glote** | ĉe la voĉkordoj en la gloto – en la gorĝo (H) |

### Voĉeco

Esperanta konsonanto povas esti:

| | |
|---|---|
| **voĉa** | la voĉkordoj vibras dum la konsonanto estas elparolata (B, D, G, V, Z, Ĵ, Ĝ, M, N, L, R) |
| **senvoĉa** | la voĉkordoj ne vibras (P, T, K, F, S, Ŝ, Ĥ, H, C, Ĉ) |

### La 23 konsonantoj de Esperanto

| Konsonanto | Priskribo | Sonsimbolo laŭ la Internacia Fonetika Alfabeto |
|---|---|---|
| **B** | eksploda lipa voĉa | [b] |
| **P** | eksploda lipa senvoĉa | [p] |
| **D** | eksploda denta voĉa | [d] |
| **T** | eksploda denta senvoĉa | [t] |
| **G** | eksploda vela voĉa | [g] |
| **K** | eksploda vela senvoĉa | [k] |
| **V** | frota lipdenta voĉa | [v] |
| **F** | frota lipdenta senvoĉa | [f] |
| **Z** | frota denta voĉa | [z] |
| **S** | frota denta senvoĉa | [s] |
| **Ĵ** | frota gingiva voĉa | [ʒ] |
| **Ŝ** | frota gingiva senvoĉa | [ʃ] |
| **Ĥ** | frota vela senvoĉa | [x] |
| **H** | frota glota senvoĉa | [h] |
| **C** | ekfrota denta senvoĉa | [ts] |
| **Ĝ** | ekfrota gingiva voĉa | [dʒ] |
| **Ĉ** | ekfrota gingiva senvoĉa | [tʃ] |
| **M** | naza lipa voĉa | [m] |
| **N** | naza denta voĉa | [n] |
| **L** | duonbara denta voĉa | [l] |
| **R** | trema denta voĉa | [r] |
| **J** | duonvokalo malvasta antaŭa | [j] |
| **Ŭ** | duonvokalo malvasta malantaŭa | [w] |

### Konsonanta variado

Ĉu sono estas voĉa aŭ senvoĉa gravas plej, se ekzistas du sonoj, kiuj malsimilas nur per la voĉeco, ekz. B – P kaj Ĝ – Ĉ. Por aliaj sonoj la voĉeco ne estas tre grava. Ekz. H estas normale senvoĉa, sed ĝi povas fariĝi voĉa sen ia ajn problemo, ekz. inter vokaloj (*kahelo*, *kohera* k.a.).

Kiam senvoĉa konsonanto staras tuj antaŭ voĉa konsonanto, multaj emas voĉigi ĝin: *akvo* → "agvo", *okdek* → "ogdek". Kaj inverse, kiam voĉa konsonanto staras antaŭ senvoĉa, multaj emas senvoĉigi ĝin: *subtaso* → "suptaso", *absolute* → "apsolute". Tiaj ŝanĝoj principe neniam estas regulaj, sed estas ofte toleritaj en la praktiko, se ili ne kaŭzas miskomprenojn. Aparte malfacila estas la sinsekvo KZ, kiu ofte elparoliĝas kiel GZ: *ekzemple* → "egzemple". Tio estas neregula, sed praktike akceptata. Iafoje iuj eble emus senvoĉigi vortfinan voĉan konsonanton: *apud* → "aput", *sed* → "set", *hund'* → "hunt", *naz'* → "nas". Tiaj ŝanĝoj tamen ne estas akceptitaj, kaj oni evitu ilin.

Anoj de iuj lingvoj emas elparoli la sinsekvojn KV kaj GV kiel respektive "kŭ" kaj "gŭ": *akvo* → "akŭo", *kvin* → "kŭin", *gvidi* → "gŭidi". Ŭ neniam povas sekvi rekte post konsonanto en vera Esperanta vorto (vidu ĉi-poste), kaj tial miskomprenoj apenaŭ povas estiĝi, sed tia elparolo estas principe malĝusta.

En kelkaj lingvoj oni elparolas la sonojn P, T, K, C kaj Ĉ kun forta elspiro, kvazaŭ kun malforta H poste. En Esperanto tiuj konsonantoj estas normale sen tia elspiro, sed pri tio ne ekzistas regulo. Oni povas do elparoli kun elspiro, se oni volas, sed oni atentu, ke la elspiro ne sonu kiel plena H.

L estas farata per parta baro ĉe la dentoj. Se oni baras nur tie, la L sonas "hele". Se oni samtempe levas la malantaŭon de la lango kontraŭ la velo, la L sonas "malhele" (u-ece). Tia malhela L estas tute bona alternativo, sed oni atentu, ke ĝi ne sonu kiel Ŭ. Tio okazas, se la ĉefa baro ĉe la dentoj malaperas.

N estas denta naza konsonanto. Ĝi kontrastas al la alia naza konsonanto M, kiu estas lipa. Kiam N staras antaŭ gingiva aŭ vela sono, oni emas ŝanĝi N en gingivan sonon (malgranda diferenco), aŭ velan sonon (granda diferenco), por faciligi la elparolon: *tranĉi*, *manĝi*, *longa*, *banko* k.a. Tio estas senproblema, ĉar ne ekzistas gingiva aŭ vela nazaj sonoj, kun kiuj N povus konfuziĝi. Simile oni emas elparoli M lipdente antaŭ alia lipdenta sono: *amforo*, *ŝaŭmvino* k.a. Ankaŭ tio estas senproblema. Sed oni atentu, ke oni ne elparolu N lipdente: *infero*, *enveni* k.a., ĉar tiam oni konfuzus N kaj M, kio ne estas akceptebla. Kompreneble oni povas ĉiam uzi la bazan elparolon de N kaj M. Nepre erare estas elparoli N kiel M (pro influo de sekvanta lipa konsonanto), ekzemple *mampremo* anstataŭ *manpremo*.

R estas trema konsonanto, kiu normale estas denta, sed fakte ne gravas, kie en la buŝo oni faras la sonon. Ekz. uvula (kartava) R estas tute bona alternativo. La grava afero pri R estas, ke ĝi estu trema. Do ankaŭ uvula R prefere estu trema, "rulata" (tiam la uvulo tremas kontraŭ la lango). R estu same trema en ĉiaj pozicioj en la vorto. En ekz. *rivero* la du R estu same elparol-

ataj. Efektive tamen oni uzas ankaŭ diversajn aliajn specojn de R-sonoj, ankaŭ netremajn, kaj tio estas sufiĉe akceptita en la praktiko. Oni tamen zorgu, ke la R-sono ne konfuziĝu kun alia konsonanto, ekz. L. Oni klare distingu inter ekz. *revi* kaj *levi*, inter *maro* kaj *malo*, k.t.p. Oni ankaŭ atentu pri R post vokalo: *parko* ne sonu kiel *pako*, *karto* ne konfuziĝu kun *kato*, k.t.p.

La longeco de la konsonantoj estas en Esperanto tute sensignifa. Oni povas elparoli ilin longe, mezlonge aŭ mallonge, laŭplaĉe.

### Ekfrotaj konsonantoj

La ekfrotaj sonoj C, Ĉ kaj Ĝ tre similas al sinsekvoj de samlokaj eksplodaj kaj frotaj sonoj: TS, TŜ kaj DĴ. Tiuj sinsekvoj ekzistas nur en kunmetitaj vortoj: *tut-simple*, *dat-ŝanĝo*, *kased-ĵurnalo*. Estas tamen diferenco inter tiaj sinsekvoj kaj veraj ekfrotaj konsonantoj. En TS, TŜ kaj DĴ oni povas elparoli la eksplodan sonon kun plena rompo de la baro. En C, Ĉ kaj Ĝ la baro neniam estas plene rompata. Estus eraro elparoli ekz. C kiel plenan T + plenan S. Alia diferenco estas, ke C, Ĉ kaj Ĝ kondutas kiel memstaraj unuoj en la lingvo. Ili aperas ofte kaj en plej diversaj pozicioj: *ĉu*, *laĉo*, *eĉ*, *centro*, *eco*, *scias* k.t.p. Kontraste la malofta sinsekvo DZ (ekz. *edzo*), kiu estas kvazaŭ voĉa C, estas en Esperanto sinsekvo de du konsonantoj, kaj oni ĉiam povas elparoli D kaj Z aparte (en rapida elparolo oni tamen plej ofte elparolas ilin kunece, ekfrote). Ankaŭ la maloftegaj KĤ (*muzikĥoro*), PF (*pfenigo*) kaj BV (*Zimbabvo*) estas sinsekvoj de samlokaj (aŭ preskaŭ samlokaj) eksplodaj kaj frotaj sonoj. Oni povas ilin elparoli ĉu aparte, ĉu kunece (ekfrote).

> **Noto:** Iafoje oni trovas nekunmetitajn vortojn kun TS, ekz. **tsetseo**, **Pitsburgo**, kaj **Potsdamo**. Normalaj Esperantaj formoj estas tamen *ceceo*, *Picburgo*° kaj *Pocdamo*°.

### Duonvokaloj

La duonvokaloj J kaj Ŭ estas laŭ la elparola maniero vokaloj: Ili estas farataj sen baro de la aerfluo. Sed ili rolas en la lingvo kiel konsonantoj. Ili estas ĉiam mallongaj, kaj neniam povas ricevi akcenton. Duonvokalo ĉiam aperas kune kun vera vokalo, kaj sin apogas al tiu vokalo en la elparolo.

La duonvokalo Ŭ aperas normale nur en la sinsekvoj AŬ kaj EŬ. La sinsekvoj OŬ, IŬ kaj UŬ estas fremdaj al Esperanto. Okaze oni vidas vortojn kun OŬ, sed por preskaŭ ĉiu OŬ-vorto ekzistas preferinda alternativo sen OŬ: *poŭpo* (prefere *pobo*), *toŭfuo* (prefere *tofuo*°). IŬ kaj UŬ neniam aperas.

La *Fundamento* diras, ke "Ŭ estas uzata nur post vokaloj". Escepto estas la Fundamenta liternomo (§15.6) *ŭo*. Ekzistas ankaŭ sonimitoj (§18.3) kiel *kŭaks* kaj *ŭa*, sed ili ne estas veraj vortoj. Vortoj, kiuj en iuj aliaj lingvoj havas komencan aŭ postkonsonantan Ŭ-sonon, havas en normala Esperanto la sonon V: *akvo*, *kvar*, *lingvo*, *Gvatemalo*, *Vaŝingtono*, *sandviĉo*, *visto* k.t.p. Iafoje Esperanto havas U: *Eduardo*, *Ruando*, *tualeto*, *trotuaro*.

Iuj volas uzi Ŭ en ĉiaj pozicioj. Ili kreas vortojn, kiuj havas komencan aŭ postkonsonantan Ŭ: **Gŭatemalo**, **ŭato**, **ŭesto** k.s. Oni uzu *Gvatemalo*, *vato* kaj *okcidento*.

Se oni uzas Esperantajn literojn por proksimume transskribi la sonon de alilingvaj vortoj (ekz. propraj nomoj), oni povas uzi Ŭ pli libere: *Ŭakajama* (*Wakayama*, japana urbo), *Ŭinĉestr* (*Winchester*, angla urbo), *Ŭoŝingtn* (*Washington*), *Rŭanda* (*Rwanda*, lando en Afriko). Tiam tute ne temas pri Esperantaj vortoj, kaj neniuj Esperantaj limigoj de literuzado validas. Se oni plene esperantigas tiujn nomojn, oni uzu *Vakajamo*°, *Vinĉestro*°, *Vaŝingtono* kaj *Ruando*.

La duonvokalo J estas uzebla antaŭ kaj post ĉiu ajn Esperanta vokalo.

Oni klare diferencigu J kaj I. Kiam I estas akcentata, tio estas sufiĉe facila, ekz. *jes – ies*, *jam – iam*, *ja – ia* kaj *jen – ien*. Kiam I estas senakcenta, la diferenco estas pli malgranda, sed tamen grava. Distingu zorge inter ekz. *mielo – mjelo* kaj *violo – vjolo*. En tiaj vortoj I devas esti pli longa ol J, kvankam I ne havas akcenton. (Tiaj vortparoj estas tamen tre malmultaj.) En tre rapida parolo tamen ne ĉiam eblas tute klare diferencigi inter senakcenta I kaj J (§2.2). Vortoj kiel *regiono* ofte elparoliĝas pli-malpli kiel *"regjono"*. Tio estas principe malĝusta, sed kiam konfuzo ne eblas (ne ekzistas ia vorto **regjono**), oni estu tolerema pri tiaj elparoloj.

Normale J estas elparolata tute kiel mallonga I, sen ĉia frota sono, sed se oni nur iom pli malvastigas la malfermaĵon inter la lango kaj la buŝa plafono, povas ekesti malforta frota sono. Tia elparolo de J estas tute akceptebla varianto, precipe kiam J aperas antaŭ vokalo: *justa*, *jes*, *kajako*, *vjolo*. Kiam J aperas antaŭ aŭ post I, estas preskaŭ necese elparoli kun iomete da froteco, por ke J entute estu rimarkebla: *jido*, *jingo*, *Tanganjiko*, *ŝijaismo*. Sed oni ne elparolu kun tiel forta frota sono, ke J sonas preskaŭ kiel Ĵ, ĉar tiam povas ekesti miskomprenoj. Atentu pri vortparoj kiel la jenaj: *juro – ĵuro*, *jako – ĵako*, *jeto – ĵeto*, *majoro – maĵoro*.

Iafoje oni demandas, ĉu en ekz. *kajo* kaj *naŭa* la duonvokalo apogu sin al la antaŭa aŭ la posta vokalo. Ĉu estu "ka-jo" aŭ "kaj-o"? Ĉu estu "na-ŭa" aŭ "naŭ-a"? Pri tio ne ekzistas reguloj. Oni povas elparoli laŭplaĉe. Tamen Ŭ plej ofte apogas sin al la antaŭa vokalo, al kiu ĝi tre forte apartenas. La duopoj AŬ kaj EŬ estas kvazaŭ fiksitaj sonkombinoj. Vidu ankaŭ la klarigojn pri silaboj kaj silabolimoj (§2.2).

### Ĥ kaj H

Ofte oni legas, ke la diferenco inter Ĥ kaj H estas malsama forto de elspiro. Tio estas miskompreno. Ambaŭ estas senvoĉaj frotaj sonoj. La fortecoj de iliaj "elspiroj" eble estas malsamaj, sed ili ne distingiĝas laŭ la spirado. La vera diferenco estas, ke Ĥ estas farata ĉe la velo, per la lango, dum H estas farata en la gloto, per la voĉkordoj. H fakte estas kvazaŭ senvoĉa vokalo. Se oni havas problemojn pri H, oni eble povas lerni ĝin deirante de vokalo, kiun oni poste senvoĉigas. Por lerni elparoli la sonon Ĥ, oni povas deiri de K, kaj iom post iom malfortigi la langan baron, kiu fermas la aerfluon, por ke la aero povu traflui. K tiam fariĝas frota sono, Ĥ.

### Alternativoj de Ĥ-vortoj

Ĥ estas la plej malofta el la Esperantaj sonoj. Multaj opinias, ke ĝi estas tro malfacila, ĉar ĝi mankas en kelkaj lingvoj. La vera kaŭzo, ke Ĥ estas malfacila por iuj, estas ĝia maloftegeco en Esperanto. Se oni havas malfacilojn pri Ĥ, oni preskaŭ neniam havas okazon ekzerci sin pri ĝi.

De la unuaj jaroj ekzistas tendenco krei alternativojn al vortoj kun Ĥ. K estas la plej proksima sono, ĉar ĝi estas elparolata en la sama loko kiel Ĥ. Tial oni plej ofte anstataŭigas Ĥ per K en la alternativaj vortoj: *ĥemio* = *kemio*, *ĥirurgo* = *kirurgo*, *ĥaoso* = *kaoso*, *meĥaniko* = *mekaniko*, *teĥniko* = *tekniko*, k.t.p. Por ĉiu radiko, en kiu Ĥ sekvas tuj post R, ekzistas alternativa formo kun K: *arĥeologio* = *arkeologio*, *arĥitekto* = *arkitekto*, *monarĥo* = *monarko*.

En kelkaj okazoj simpla anstataŭigo per K kreus kolizion kun alia vorto. Tiam oni povas anstataŭigi per alia litero, ekz. Ĉ, aŭ ŝanĝi la vorton en alia maniero: *Ĥino* = *ĉino* (*kino* havas alian signifon), *ĥilo* = *ĉilo* (*kilo* havas alian signifon), *ĥolero* = *kolerao* (*kolero* havas alian signifon), *ĥoro* = *koruso* (*koro* havas alian signifon).

Ĝenerale ambaŭ vortoj de tiaj vortparoj estas plene uzeblaj. Kaj la malnova Ĥ-formo, kaj la nova vorto sen Ĥ, estas egale bonaj. Kiun oni uzu, dependas de la propra gusto. Tamen en kelkaj okazoj la Ĥ-formo plene malaperis el la praktika uzo, kaj tiam ordinare ne estas rekomendinde reenkonduki ĝin. Ekz. *ĥino* plene malaperis. Oni uzu prefere nur la formon *ĉino* (krom se oni ial volas uzi malnovecan lingvaĵon).

Iuj Ĥ-vortoj ankoraŭ ne havas ĝenerale akceptitan sen-Ĥ-an alternativon. Ekz. *eĥo* kaj *Ĉeĥo*.

## 2.2. Specialaj elparolaj reguloj

### Kromakcentoj

En longaj vortoj povas aperi, krom la ĉefakcento sur la antaŭlasta vokalo (§2.1), ankaŭ pli malfortaj akcentoj, **kromakcentoj**, precipe en kunmetitaj vortoj. Kromakcentoj estos ĉi-poste montrataj per maldekstrakorna supersigno: à, è, ì, ò, ù. Ĉefakcenton montras dekstrakorna supersigno kaj grasa stilo: **á**, **é**, **í**, **ó**, **ú**.

La vorto *matenmanĝo* povas elparoliĝi: *matenm**á**nĝo* (sen kromakcento), *matènm**á**nĝo* (kromakcento je *e*) aŭ *màtenm**á**nĝo* (kromakcento je *a*).

Oni elparolas *matenm**á**nĝo* aŭ *màtenm**á**nĝo*, se oni sentas la vorton kiel unu tuton. Oni elparolas *matènm**á**nĝo*, se oni volas distingi la partojn de la kunmetaĵo. Oni tiam kvazaŭ elparolas la vorton *mateno*, kiu havas akcenton sur E.

Regulo ekzistas nur pri ĉefakcentoj. Kromakcentoj estas ĉiam libervolaj. Oni principe povas elparoli tute sen kromakcentoj, sed kiam oni ja uzas kromakcenton, oni povas ĝin meti, kien oni volas.

Por distingi parton de kunmetita vorto, oni en la praktiko ofte eĉ malobeas la regulon pri ĉefakcentoj. Oni povas tiom akcenti sur la E de *matenmanĝo*, ke

ĝi fariĝas pli forta ol la ĉefakcento. Tio estas natura, kiam oni volas forte kontrastigi inter ekz. *vespermanĝo* kaj *matenmanĝo*. Tiel oni ofte emfaze akcentas la prefikson MAL, kiam oni volas forte kontrastigi ion al ĝia malo, ekz.: *Tio ne estas bona, sed màlbona.* (Kun tre forta akcento sur MAL.) Efektive oni tiam elparolas kvazaŭ MAL estus aparta vorto: *"mal bona"*. Tiaj okazaj rompoj de la akcentoregulo estas tute naturaj kaj permeseblaj.

## Distingaj paŭzetoj

Alia rimedo por distingi la partojn de kunmetita vorto estas enmeti mallongegajn paŭzetojn inter la partoj. Normale tiaj paŭzetoj estas uzataj kune kun kromakcentoj. Ĉi-poste la signo vertikalo, |, montras tiajn paŭzetojn:

- *Maten|manĝo* kontrastas al ekz. *vesper|manĝo*.
- *Konk|ludo* (kunmetita) kontrastas al *konkludo* (nekunmetita).

Ne ekzistas devigaj reguloj pri distingaj paŭzetoj. Oni nepre ne trouzu ilin, ĉar tio malbeligas la elparolon. Principe oni povas elparoli tute sen distingaj paŭzetoj.

## Silaboj kaj silabolimoj

En la *PMEG*-aj klarigoj pri akcentoj (§2.1) kaj kromakcentoj estas parolado nur pri akcentataj **vokaloj**. En la vero oni akcentas ne nur vokalon, sed ankaŭ eventualajn apudajn konsonantojn, kiuj "apartenas" al tiu vokalo. Vokalo kune kun siaj konsonantoj formas tiel nomatan **silabon**, en kiu la vokalo kaj la konsonantoj elparoliĝas kune. Ĉiu vorto do konsistas el unu aŭ pluraj silaboj, sed ne ekzistas reguloj, kiuj difinas precizajn limojn inter silaboj en plursilabaj vortoj. Oni povas dividi la trisilaban vorton *sistemo* kiel *sis-te-mo*, *si-ste-mo*, *sis-tem-o* aŭ *si-stem-o* kaj eble eĉ en ankoraŭ aliaj manieroj. Ĉiuokaze nur ĉe relative malrapida elparolo eblas vere aŭdi la subtilajn diferencojn inter tiaj diversaj manieroj dividi vorton en silabojn. Ofte unu divido povas esti la plej natura kaj komforta, sed ofte ekzistas pli ol unu bona eblo. Kiam oni skribe distranĉas vortojn inter linioj (§1.2), oni ofte faras tion laŭ la silabolimoj.

**Noto:** En paragrafoj 2 kaj 3 de la *Ekzercaro* (en la *Fundamento*) estas ekzemploj de bonaj kaj rekomendindaj silabodividoj. Tie la vorto *sistemo* aperas kiel *sis-te-mo*, sed la Fundamento ne diras, ke tiu estas la sola ĝusta maniero trakti tiun vorton.

Kiam oni volas elparoli kunmetitan vorton tre klare, aparte montrante la limojn inter la vortopartoj, oni nature uzas silabodividon laŭ tiuj limoj. La malofta kunmetaĵo *konkludo* (= ludo per konkoj) povas do soni kiel *kon-klu-do* en rapida elparolo, sed kiel *konk-lu-do*, kiam oni volas klare montri, kiel tiu vorto estas kunmetita. Kontraste la ofta vorto *konkludo* (= rezulto de rezonado) kredeble ĉiam sonas kiel *kon-klu-do*.

## Foresto de akcento

En praktika elparolado iuj vortoj havas pli da emfazo ol aliaj pro sia senco kaj relativa graveco. Kiam vorto kun pli ol unu vokalo estas relative malgrava en frazo kaj sekve ne havas emfazon, tiam en la praktiko oni ofte tute ne uzas akcenton. Tio plej ofte okazas pri vortetoj kiel *antaŭ*, *ili* kaj *kiel*, sed ankaŭ al verboj kiel *esti*, *havi* kaj *fari*.

Ĉi-poste **graseco** montras frazan emfazon de vorto, dum vokaloj kun dekstrakorna supersigno montras akcenton:

- *Antaŭ* ***tri tágoj*** *mi* ***vizítis*** *vian* ***kúzon*** *kaj mia* ***vizíto*** *faris al li* ***plezúron****.* [FE.20] Ĉe la vortoj *antaŭ*, *vian*, *mia* kaj *faris* teorie devus esti akcento je la antaŭlasta vokalo, sed en la praktiko ili plej verŝajne estas elparolataj tute sen akcento en tiu ĉi ekzemplo, ĉar ili ne ricevas frazan emfazon. En ekz. la vorto *mia* la du vokaloj I kaj A sekve estas elparolataj ambaŭ sufiĉe mallonge, kaj apenaŭ eblas aŭdi akcenton ĉe I. Se oni parolas tre rapide, eĉ povas esti, ke la I de *mia* sonas pli-malpli kiel J: *"mja"*.
- ***Rózo*** *estas* ***flóro*** *kaj* ***kolómbo*** *estas* ***bírdo****.* [FE.5] En tiaj ĉi frazoj oni ordinare elparolas la verbon *estas* sufiĉe malforte kaj rapide, kaj sen klare aŭdebla akcento, ĉar la aliaj vortoj estas pli gravaj kaj esprimas la plejparton de la senco. Eĉ povas esti, ke la unua vokalo de *estas*, E, kiu teorie devus esti akcentata, praktike preskaŭ forfalas: *"Rozo 'stas floro kaj kolombo 'stas birdo."* Tia elparolo estas principe malĝusta, sed tamen ofte aperas en rapida parolado.

La ĉi-antaŭe montrataj elparolmanieroj ne estas la solaj eblaj, sed ili estas sufiĉe verŝajnaj. En ambaŭ ekzemploj oni povas uzi tute aliajn frazajn emfazojn, se oni volas. Tio tute dependas de la kunteksto, kaj de la nuancoj, kiujn la parolanto volas esprimi.

## Duoblaj literoj

Du sinsekvajn identajn literojn oni elparolu duoble.

Duoblaj vokaloj estas oftaj. Oni devas elparoli ambaŭ vokalojn: *opinii* = *opin**í**-i*, *ĝuu* = *ĝ**ú**-u*, *treege* = *tre-**é**ge*, *metroo* = *metr**ó**-o*, *praa* = *pr**á**-a*, *maato* = *ma-**á**to* k.t.p. Duobla vokalo ne egalas al duoble longa vokalo. Ĉiu el la du vokaloj devas esti aparte elparolata.

Duoblaj konsonantoj ekzistas en kunmetitaj vortoj kaj en kelkaj malmultaj radikoj, ĉefe propraj nomoj. Oni devas elparoli ambaŭ konsonantojn.

Ĉe duoblaj eksplodaj sonoj oni devas aŭdigi du eksplodojn, ekz.: *ekkoni* = *ek-koni* (du apartaj K-sonoj), *tualettablo* = *tualet-tablo* (du apartaj T-sonoj). Komparu kun ekz. KP aŭ PT (*ekpensi*, *kapti* ...), kie ambaŭ eksplodaj konsonantoj estu plene elparolataj.

Multaj tamen simpligas la elparolon de duoblaj eksplodaj konsonantoj. Ĉe ekz. duobla T ili ne eksplodigas la unuan T-sonon, sed elparolas unu longan T (ili tenas la baron de la aerfluo pli longe). Ĉe rapida aŭ ne aparte zorga elparolo tia simpligo estas tolerebla, sed ĉe zorga elparolo oni devas ĉiun konsonanton elparoli.

Ankaŭ ĉe duoblaj seneksplodaj konsonantoj oni devas elparoli ambaŭ sonojn plene. Sed tiaj konsonantoj ne enhavas ian paŭzon. Ĉe ekz. NN, LL, SS, FF k.s. oni ne bezonas fari distingan paŭzon inter la du konsonantoj, ekz.: *sennoma*, *ennaĝi*, *Anno* [FE.36], *finno*, *mallonga*, *Pollando*, *ellerni*, *Ŝillero* [FG.56]. En kunmetitaj vortoj povas tamen esti nature fari paŭzeton (*mal-longa*, *Pol-lando*, *en-naĝi*, *huf-fero*), sed tio ne estas deviga.

## Duoblaj konsonantoj ene de radikoj

Duoblaj konsonantoj ene de radikoj estas maloftaj kaj fremdaj en Esperanto, sed tute ne malpermesitaj. Jam en la *Fundamento* troviĝas la nomoj *Anno* [FE.36] kaj *Ŝillero* [FG.56]. Ili havas duoblajn seneksplodajn konsonantojn, kiuj estas ne tro malfacile elparoleblaj.

Ekzistas ankaŭ kelkaj malmultaj radikoj kun duoblaj eksplodaj konsonantoj: *nette*, *vatto*, *Mekko* k.a. Se oni uzas tian vorton, oni devas ĝin elparoli laŭ la ĉi-antaŭaj reguloj, sed ĉiam eblas trovi alternativon pli facile elparoleblan: *nete*, *vato*, *Mekao*° k.s.

Estas rekomendinde uzi duoblajn konsonantojn nur en kunmetitaj vortoj kaj en propraj nomoj. Krome oni uzu en propraj nomoj prefere nur seneksplodajn duoblajn konsonantojn laŭ la modelo de la Fundamentaj *Anno* kaj *Ŝillero*. La popolnomo *finno* ne estas propra nomo, sed popolnomoj estas similaj al propraj nomoj. En zorga elparolo oni distingu klare inter *finno* kaj *fino*, kaj la kunmetaĵon *Finnlando* oni ne konfuzu kun *fin-lando*.

## TC, TĈ, DĜ

Similaj al duoblaj konsonantoj estas la maloftaj sinsekvoj TC, TĈ kaj DĜ. Ili devas esti plene elparolataj: *budĝeto* = *bud-ĝeto*, *matĉo* = *mat-ĉo*. Ankaŭ por tiaj malfacile elparoleblaj vortoj eblas trovi pli facilajn alternativojn, ekz.: *buĝeto*, *maĉo*.

## Elparolo de mallongigoj

Mallongigojn oni povas elparoli per la nomoj de la literoj (§1.1). Ĉiu litero tiam elparoliĝas kiel aparta vorto. Iajn mallongigojn oni povas elparoli kiel vortojn. Oni ankaŭ povas ĉiam elparoli per la plena ne mallongigita formo.

**ILEI** povas esti elparolata en tri manieroj:

- *ilé̱i* (kiel unu vorto, ofta elparolo)
- *i lo e i* (per la liternomoj, kiel kvar apartaj vortoj, malofta elparolo)
- *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj* (plene)

**OkSEJT** povas esti elparolata en tri manieroj:

- *o ko so e jo to* (per la liternomoj, kiel ses apartaj vortoj)
- *oksé̱jt* (oni ofte akcentas la lastan vokalon en unuvorta elparolo, se la mallongigo finiĝas per konsonanto – komparu kun akcentado de fremdaj vortoj, §2.3)
- *Okcidenta Somera Esperantista Junulara Tendaro* (plene)

**k.t.p.** povas esti elparolata en du manieroj:

- *ko to po* (per la liternomoj, kiel tri apartaj vortoj)
- *kaj tiel plu* (plene)

**IJK** povas esti elparolata en du manieroj:

- *i jo ko* (per la liternomoj, kiel tri apartaj vortoj)
- *Internacia Junulara Kongreso* (plene)

Kiam oni elparolas per la liternomoj, oni ordinare iom pli emfazas la lastan liternomon (ekz. “i jo k**ó**”), sed oni ne kunŝovu la liternomojn en unu vorton (kvankam mallongigoj normale estas skribataj unuvortece). Se oni elparolus unuvorte, oni devus akcenti la antaŭlastan vokalon, **kot**ó**po**, **ij**ó**ko**. Tia elparolo iafoje aperas, sed ĝi ne estas normala, nek konsilinda.

## 2.3. Ne-Esperantaj vortoj — elparolo

Kiam ne-Esperanta nomo (aŭ alispeca fremda vorto) aperas en Esperanta frazo, ekzistas tri manieroj elparoli:

- Oni povas la nomon elparoli laŭ la origina lingvo (almenaŭ proksimume), kio postulas sciojn de tiu lingvo. Tio ĉiam estas ĝusta elparolmaniero, sed ne ĉiam efika maniero komuniki.
- Oni povas la nomon elparoli tiel, kiel oni ĝin elparolas en sia propra lingvo (kiam tiu ne estas la origina lingvo). Tio bedaŭrinde tre ofte okazas, sed estas tre malrekomendinda, ĉar tiam eble nur parolantoj de tiu lingvo bone rekonas la nomon.
- Oni povas la nomon elparoli en esperanteca maniero. Tio estas ankoraŭ malofta, sed tre rekomendinda, ĉar ĉiuj parolantoj de Esperanto havas ŝancon rekoni la nomon.

Kiam ekzistas plene esperantigita nomformo (§35.3), kiu estas vaste konata, uzado de tiu formo estas kompreneble la plej efika maniero komuniki. Legu pli pri ne-esperantigitaj nomoj en §35.2.

### Esperanteca elparolo

Kiam anoj de diversaj lingvoj parolas sian lingvon kaj uzas fremdajn nomojn, ili normale ne elparolas laŭ la fremda lingvo, sed spontane ŝanĝas la elparolon laŭ la elparolaj kutimoj de sia propra lingvo. Simile esperantistoj povas elparoli fremdajn nomojn laŭ la elparola sistemo de Esperanto. Tion oni povas nomi **esperanteca elparolo**.

Esperanteca elparolo ne signifas, ke oni elparolas ĉiun literon laŭ la Esperantaj reguloj, sed ke oni elparolas uzante kiom eble nur Esperantajn sonojn. La celo estas trovi elparolmanieron, kiu faras la nomon rekonebla por ĉiu ajn esperantisto. Oni atentu kaj la fremdan elparolon, kaj la fremdan skribon, ĉar multaj nomoj estas pli konataj en sia skriba formo. Ofte estas bone serĉi kompromison inter la origina sono kaj la sonsistemo de Esperanto. Kiam oni ne konas la originan elparolon, sed eble nur la skribon, oni devas improvizi. Necesas esti tre tolerema pri elparolo de fremdaj nomoj en Esperanto. La celo ne estas montri siajn sciojn de fremdaj lingvoj, sed komuniki kiel eble plej efike.

En fremdaj vortoj ofte aperas la ne-Esperantaj literoj Q, W, X kaj Y (§1.2). Por ili oni povas uzi la sekvajn elparolojn:

- Q kiel “k”; QU kiel “kv”
- W kiel “ŭ” (aŭ kiel “v”)
- X kiel “ks”

- Y kiel “j” (antaŭ aŭ post vokalo) aŭ kiel “i” (en aliaj okazoj)

### Ekzemploj de eblaj esperantecaj elparoloj

La ĉi-postaj esperantecaj elparoloj ne estas la solaj eblaj. Oni povas diversgrade atenti la originan elparolon kaj la Esperantan sonsistemon. Memoru ankaŭ, ke oni ĉiam povas uzi la originan elparolon senŝanĝe, se oni tion preferas.

- *Coca-Cola* → *koka kola* (angla nomo de trinkaĵo). La “O” (diftongo) fariĝas simpla vokalo. La malklaraj finaĵvokaloj fariĝas A laŭ la skribo.
- *Chaplin* → *ĉaplin*, *ĉeplin* (usona nomo de kinartisto). La “A” elparoliĝas angle inter A kaj E. Verŝajne A laŭ la skribo estas preferinda, sed ankaŭ E eblas. La malklara elparolo de “I” fariĝas I.
- *Winchester* → *vinĉester* (angla urbonomo). La “W” (= Ŭ) fariĝas V, ĉar Esperanta Ŭ normale ne aperas vortkomence. La malklara “E” fariĝas E. La fina “ER”, kiu elparoliĝas kiel vokaleca R, fariĝas ER, ĉar Esperanta R ne povas esti vokalo.
- *Dreyfus* → *dre(j)fus* (nomo de historie fama franca oficiro). La “Y” estas neelparolata france. Ĝi povas fariĝi J aŭ malaperi. La “U” (ronda antaŭa vokalo) fariĝas U laŭ la skribo.
- *Honoré de Balzac* → *(h)onore de balzak* (franca nomo de verkisto). La “H” estas neelparolata france. Ĝi povas resti, laŭ la skribo, aŭ malaperi. La malklara vokalo en *de* fariĝas E laŭ la skribo.
- *Changzhou* → *ĉan(g)ĝo* (ĉina urbonomo). La spira “CH” fariĝas Ĉ. La senspira “ZH” fariĝas Ĝ. La “NG” (vela naza konsonanto) fariĝas N, aŭ eventuale N + G laŭ la skribo. La diftongo “OU”, kiu estas fremda al Esperanto, fariĝas O.
- *al-Ghurdaqa* → *(al-)ĥurdaka* aŭ *(al-)gurdaka* (araba nomo de egipta havenurbo). *Al* estas difina artikolo kaj povas forfali. “GH” (= voĉa Ĥ) fariĝas Ĥ aŭ G. La ekstreme malantaŭa “Q” fariĝas K.
- *Haliaeëtus leucoryphus* → *halieetus leŭkorifus* (latina scienca nomo de birdospeco; la Esperanta nomo estas *haliaeto*). La “AE” fariĝas E. La “Y” fariĝas I.
- *Kalocsay* → *kaloĉai* (hungara nomo de Esperanta verkisto). Hungara malhela “A” fariĝas ordinara A laŭ la skribo.
- *Malmö* → *malme*, *malmo* (sveda urbonomo). La “Ö” (antaŭa ronda vokalo) fariĝas E aŭ O.

### Akcentado

Ekzistas tri manieroj akcenti en esperanteca elparolo. Por ĉiu nomo oni elektu manieron, kiu ŝajnas oportuna:

- Se la origina lingvo havas akcenton, oni povas konservi la originan akcenton.

- Oni povas akcenti sur la antaŭlasta vokalo laŭ la Esperanta akcento-regulo. Tio estas ofte natura, kiam la nomo ŝajnas havi ian finaĵon similan al la Esperantaj finaĵoj.
- Oni povas imagi finan apostrofon (§10.1) – anstataŭ O-finaĵo – kaj akcenti lastvokale.

- *Coca-Cola* → *k**ó**ka k**ó**la* aŭ *kokak**ó**la*
- *Chaplin* → *ĉ**á**plin* aŭ *ĉapl**í**n*
- *Haliaeëtus leucoryphus* → *hali**é**etus leŭk**ó**rifus* aŭ *halie**é**tus leŭkor**í**fus*
- *Kalocsay* → *k**á**loĉai* aŭ *kaloĉ**á**i*
- *Malmö* → *m**á**lmo*, *m**á**lme* (la “duobla” sveda akcento fariĝas ordinara akcento)

# Gramatiko

## 3. Gramatika superrigardo

Ĉi tiu superrigardo klarigas, kiel la diversaj specoj de vortoj estas nomataj en *PMEG*. Ĝi ankaŭ klarigas la bazajn principojn de frazokonstruado kaj frazanalizado.

### 3.1. Vortospecoj

Ekzistas du specoj de vortoj en Esperanto: **radikvortoj** kaj **vortetoj**.

#### Radikvortoj

Plej multaj vortoj en Esperanto estas radikvortoj. Radikvorto baze konsistas el **radiko** + **vortklasa finaĵo**, ekz.: *patro*, *rozo*, *suno*, *amo*, *sana*, *verda*, *ege*, *aparteni*, *brilas*, *estos*.

**Radikoj** esprimas plej diversajn aferojn: bestojn, homojn, agojn, kvalitojn, abstraktaĵojn, konkretaĵojn k.t.p. Radiko ne povas aperi memstare kiel vorto, sed bezonas finaĵon. Ekzistas naŭ vortigaj **finaĵoj**: O, A, E, AS, IS, OS, U, US kaj I. Se oni aldonas iun el tiuj finaĵoj al radiko, oni kreas vorton. Ĉiu ajn radiko povas akcepti ĉiun ajn finaĵon: *homo*, *homa*, *home*, *homi*, *homas* k.t.p., *bluo*, *blua*, *blue*, *blui*, *bluas* k.t.p., *kuro*, *kura*, *kure*, *kuri*, *kuras* k.t.p.

Radikvortoj povas ankaŭ konsisti el pluraj radikoj + finaĵo, aŭ el vorteto + finaĵo, k.t.p.: *vaporŝipo*, *peri* k.t.p. Legu detale pri la diversaj manieroj konstrui radikvortojn en §37.

Iuj radikoj estas uzataj ĉefe en vortokunmetado. Oni nomas ilin afiksoj (§38): EBL, UL, MAL, GE k.a.

Ekzistas pluraj miloj da radikoj, kaj daŭre aperas novaj. Ili estas nefermita klaso de lingvoelementoj. Enkonduko de novaj afiksoj estas tamen pli malfacila, ĉar ili apartenas al la kerno de la lingvo. Afiksoj estas pli fermita klaso de lingvoelementoj.

#### Vortetoj

Vorteto ne bezonas finaĵon, sed povas aperi en frazo tia, kia ĝi estas. La vortetoj estas limigita grupo de vortoj, kiuj montras tre bazajn ideojn, gramatikajn rilatojn k.t.p. Jen ĉiuj oficialaj vortetoj dividitaj en grupojn:

- Rolvortetoj (§12.3): *al*, *anstataŭ*, *antaŭ*, *apud*, *ĉe*, *ĉirkaŭ*, *da*, *de*, *dum*, *ekster*, *el*, *en*, *ĝis*, *inter*, *je*, *kontraŭ*, *krom*, *kun*, *laŭ*, *malgraŭ*, *per*, *po*, *por*, *post*, *preter*, *pri*, *pro*, *sen*, *sub*, *super*, *sur*, *tra*, *trans*.
- Pronomoj (§11): *mi*, *ni*, *vi*, (*ci*), *li*, *ŝi*, *ĝi*, *ili*, *oni*, *si*.
- O-vortecaj kaj A-vortecaj vortetoj (§15): *kiu*, *tiu*, *iu*, *ĉiu*, *neniu*, *kio*, *tio*, *io*, *ĉio*, *nenio*, *kia*, *tia*, *ia*, *ĉia*, *nenia*, *kies*, *ties*, *ies*, *ĉies*, *nenies*, *ambaŭ*, *la* (§9.1) kaj la nomoj de la Esperantaj literoj (§15.6).
- Nombraj vortetoj (§23.1): *unu*, *du*, *tri*, *kvar*, *kvin*, *ses*, *sep*, *ok*, *naŭ*, *dek*, *cent*, *mil*, *nul*.

- Kunligaj vortetoj (§16): *kaj*, *aŭ*, *sed*, *plus*, *minus*, *nek*.
- Frazenkondukaj vortetoj (§33): *ke*, *ĉu*, *se*, *ĉar*, *apenaŭ*, *dum*, *ĝis*, *kvankam*, *kvazaŭ*, *ol*.
- Komparaj vortetoj (§20.1): *kiel*, *ol*.
- E-vortecaj vortetoj lokaj (§14.1): *kie*, *tie*, *ie*, *ĉie*, *nenie*, *ĉi*, *for*.
- E-vortecaj vortetoj tempaj (§14.2): *kiam*, *tiam*, *iam*, *ĉiam*, *neniam*, *ankoraŭ*, *baldaŭ*, *hodiaŭ*, *hieraŭ*, *morgaŭ*, *jam*, *ĵus*, *nun*, *plu*, *tuj*.
- Diversaj E-vortecaj vortetoj (§14.3): *kial*, *tial*, *ial*, *ĉial*, *nenial*, *kiel*, *tiel*, *iel*, *ĉiel*, *neniel*, *kiom*, *tiom*, *iom*, *ĉiom*, *neniom*, *ajn*, *almenaŭ*, *ankaŭ*, *apenaŭ*, *des* (§17.4), *do*, *eĉ*, *ja*, *jen*, *jes* (§22.4), *ju* (§17.4), *kvazaŭ*, *mem*, *ne* (§22.4), *nur*, *pli*, *plej*, *preskaŭ*, *tamen*, *tre*, *tro*.
- Ekkriaj vortetoj kaj sonimitoj (§18): *adiaŭ*, *bis*, *fi*, *ha*, *he*, *ho*, *hura (hu ra)*, *nu*, *ve*.

Kvankam vortetoj ne bezonas finaĵojn por roli vorte, oni povas aldoni finaĵojn kaj afiksojn por krei novajn vortojn kun aliaj signifoj: *antaŭe*, *duma*, *mia*, *ilia*, *unua*, *due*, *plia*, *kialo*, *morgaŭo*, *ĉirkaŭi*, *ĝisi*, *treege*, *unuigi*, *pliiĝi* k.t.p.

45 el la vortetoj ŝajnas havi iajn finaĵojn, ŝajnas kunmetitaj, sed estas nekunmetitaj: *tio*, *tia*, *kio*, *kie*, *iu*, *iel*, *ĉiam*, *ĉiom*, *nenial*, *nenies* k.a. Tiujn vortetojn oni nomas tabelvortoj (§13).

Apenaŭ enkondukiĝas novaj vortetoj, ĉar la vortetoj estas stabila, sufiĉe fermita klaso de vortoj. Provoj enuzigi novajn vortetojn (§19) preskaŭ ĉiam montriĝas vanaj.

> **Noto:** Okazis provoj ŝanĝi iujn E-vortecajn vortetojn, kiuj finiĝas per "aŭ", en radikvortojn, ekz.: *hodiaŭ* → **hodie**, *ankoraŭ* → **ankore**, *almenaŭ* → **almene**. Nur en poezio oni povus ankoraŭ renkonti tiajn formojn. En ordinara lingvaĵo oni nepre restu ĉe la normalaj formoj.

## 3.2. Frazoj kaj frazpartoj

**Frazo** estas vico de vortoj, kiuj kune esprimas penson.

**Frazparto** estas vorto aŭ grupo de vortoj, kiuj rolas kiel unuo en frazo.

Ĉi tie temos nur pri frazoj en **aktivo**, kiu estas la baza maniero konstrui frazojn. Kelkajn specojn de frazoj oni povas transformi en pasivon (§29), kiu prezentas la agon el alia perspektivo.

### Ĉefverbo kaj frazroloj

La plej grava frazparto estas la **ĉefverbo**. Ĝi estas vorto kun iu el la finaĵoj AS, IS, OS, US kaj U (normale ne I): *iras*, *sidis*, *batos*, *vidus*, *pensu* k.t.p. Ĉefverbo montras, pri kia ago aŭ stato temas.

La ĉefverbo estas la centro de la frazo. Ĉiuj aliaj partoj de la frazo rilatas en diversaj manieroj al la ĉefverbo. Ili ludas diversajn **frazrolojn**.

Se la ĉefverbo de frazo estas *batas*, oni povas imagi ekz. la jenajn frazrolojn:

- Tiu, kiu faras la agon, ekz. *knabo*.
- Tio, kio ricevas la baton, ekz. *ŝtono*.

- Tio, per kio oni faras la baton, ekz. *martelo*.
- La tempo, en kiu okazas la ago, ekz. *vespero*.
- La loko, en kiu okazas la ago, ekz. *korto*.

Tiel formiĝas "frazo" kun ses frazpartoj:

- **Batas knabo ŝtono martelo vespero korto.**

Tio tamen ne estas ĝusta Esperanta frazo. Oni bezonas ankaŭ rolmontrilojn, kiuj klarigas, kiajn rolojn ludas la diversaj frazpartoj:

Tio, kio faras la agon de la ĉefverbo, ricevas **nenian rolmontrilon**:

→ ***Knabo** batas.*

Tio, kion la ago trafas, ricevas la **rolfinaĵon N**:

→ *Knabo batas **ŝtonon**.*

La ilo ricevas la **rolvorteton *per***:

→ *Knabo batas ŝtonon **per martelo**.*

La tempo de la ago povas ricevi diversajn rolmontrilojn depende de la preciza signifo. Ĉi tie oni povas elekti la **rolvorteton *dum***:

→ *Knabo batas ŝtonon per martelo **dum vespero**.*

Ankaŭ la loko de la ago povas ricevi diversajn rolmontrilojn depende de la preciza signifo. Ĉi tie taŭgas la **rolvorteto *en***:

→ *Knabo batas ŝtonon per martelo dum vespero **en korto**.*

Tiujn frazpartojn oni povas meti en ia ajn ordo, ekz.:

- *Knabo batas ŝtonon per martelo dum vespero en korto.*
- *Batas ŝtonon knabo per martelo en korto dum vespero.*
- *Ŝtonon dum vespero per martelo knabo batas en korto.*
- *Knabo ŝtonon per martelo batas dum vespero en korto.*

La baza signifo ne ŝanĝiĝas, sed la vortordo (§34) povas nuanci la frazon kun diversaj emfazoj.

Ekzistas tri rimedoj montri frazrolon: nenio (§12.1), la finaĵo N (§12.2), kaj rolvortetoj (§12.3).

E-vortoj (vortoj kun E-finaĵo) kaj diversaj E-vortecaj vortetoj povas montri ekz. manieron, tempon aŭ lokon sen aparta rolmontrilo:

- *Bonaj infanoj lernas **diligente**.* [FE.9] *Diligente* montras manieron, sed havas nenian rolmontrilon.
- *Venu al mi **hodiaŭ vespere**.* [FE.18] *Hodiaŭ* kaj *vespere* montras la tempon de la ago, sed partoprenas en la frazo sen rolmontriloj.

La roloj, kiujn frazpartoj povas havi, nomiĝas: **subjekto**, **objekto**, **perverba priskribo**, **alvoko** kaj **komplemento**.

### Subjekto

Subjekto (§12.1.1) estas la plej grava frazrolo (krom la ĉefverbo). La subjekto faras tiun agon, aŭ estas en tiu stato, kiun esprimas la ĉefverbo:

- ***La birdoj** flugas.* FE.9 *La birdoj* faras la agon *flugas*.
- ***Li** promenas kun tri hundoj.* FE.12 *Li* faras la agon *promenas*.
- *Sur la tero kuŝas **ŝtono**.* FE.6 La agon *kuŝas* "faras" *ŝtono*.
- ***Leono** estas forta.* FE.7 La "agon" *estas* "faras" *leono*.

Kio precize estas subjekto, tamen dependas de la verbo (§30).

### Objekto

Objekto (§12.2.2) estas tio, kio estas rekte trafata de la ago:

- *Mi amas **la patron**.* FE.8 *La patro* estas rekte trafata de la ago *amas*.
- *Ludoviko, donu al mi **panon**.* FE.8 La donado "trafas" rekte *panon*.
- *Mi vidas **leonon**.* FE.7 *Leono* estas rekte trafata de la vidado.

Kion precize signifas "esti rekte trafata de ago", dependas de la verbo (§30.3).

### Perverba priskribo

Perverba priskribo (§25.1) montras, pere de la ĉefverbo, priskribon de la subjekto aŭ de la objekto:

- *Leono estas **forta**.* FE.7 La vorto *forta* montras priskribon de la subjekto *leono*. La priskribon peras la verbo *estas*.
- *La juna vidvino fariĝis denove **fianĉino**.* FE.33 *Fianĉino* estas priskribo de la subjekto *la juna vidvino*. La priskribo okazas pere de la verbo *fariĝis*.
- *Li estas hodiaŭ **en kolera humoro**.* FE.31 *En kolera humoro* estas priskribo de la subjekto *li*.
- *Li opiniis sin **prava**.* Ij.32 *Prava* estas priskribo de la objekto *sin*. La priskribon peras la verbo *opiniis*. = *Li opiniis, ke li estas **prava**.*

### Alvoko

Alvoko (§12.1.2) estas frazrolo, per kiu oni alvokas tiun, al kiu oni volas paroli, per eldiro de ties nomo aŭ per alia O-vorto, kiu reprezentas la alvokaton:

- ***Ludoviko**, donu al mi panon.* FE.8 *Ludoviko* estas alvoko al la alparolato.
- ***Sinjoro**, vi estas neĝentila.* FE.16

### Komplemento

Komplemento estas komuna nomo de ĉiuj aliaj frazroloj ol subjekto, objekto, alvoko kaj perverba priskribo. Komplemento montras diversajn cirkonstancojn de la ago.

Komplementojn oni povas nomi laŭ la signifo: **loka komplemento, tempa komplemento, maniera komplemento** k.t.p.

Komplementojn oni ankaŭ povas nomi laŭ la formo: **N-komplemento** (havas N-finaĵon), ***al*-komplemento** (havas la rolvorteton *al*), ***en*-komplemento** (havas la rolvorteton *en*), **E-komplemento** (estas E-vorto) k.t.p.:

- ***Sur la fenestro*** *kuŝas krajono kaj plumo.* FE.6 *Sur la fenestro* estas loka komplemento, *sur*-komplemento.
- ***En la tago*** *ni vidas la helan sunon.* FE.10 *En la tago* estas tempa komplemento, *en*-komplemento.
- *Bonaj infanoj lernas* ***diligente****.* FE.9 *Diligente* estas maniera komplemento, E-komplemento.
- *Tio daŭris nur* ***malgrandan momenton****.* FA1.136 *Malgrandan momenton* estas tempa komplemento, N-komplemento.

Multaj gramatikistoj rigardas objekton kiel specon de komplemento, sed en *PMEG* objekto kaj komplemento estas rigardataj kiel malsamaj frazroloj.

### Subfrazoj

Frazo povas aperi kiel parto de alia frazo. Tian frazon ene de frazo oni nomas subfrazo (§33):

- *Diru al la patro,* ***ke mi estas diligenta****.* FE.8 La subfrazo *ke mi estas diligenta* rolas kiel objekto en la tuta frazo.

Ordinaran frazon oni povas nomi ĉeffrazo por distingi ĝin de subfrazo.

## 3.3. Ĉefvortoj kaj rektaj priskriboj

Frazparto povas konsisti el unu sola vorto, sed ofte ĝi estas kunaĵo de pluraj vortoj. Unu el la vortoj de plurvorta frazparto estas ĉefvorto, kaj la aliaj estas rektaj priskriboj de la ĉefvorto. Se la ĉefvorto estas O-vorto, la frazparto nomiĝas **O-vorta frazparto**. Se la ĉefvorto estas A-vorto, ĝi estas **A-vorta frazparto**. Se la ĉefvorto estas E-vorto, ĝi estas **E-vorta frazparto**:

- ***ĉambro*** – *Ĉambro* estas ĉefvorto. Priskriboj ne estas.
- *matura* ***homo*** – *Homo* estas ĉefvorto. *Matura* estas rekta priskribo de *homo*.
- *tre* ***granda*** – *Granda* estas ĉefvorto. *Tre* estas rekta priskribo de *granda*.
- *tre* ***longe*** – *Longe* estas ĉefvorto. *Tre* priskribas ĝin.

Oni povas ankaŭ paroli pri **E-vortecaj frazpartoj**, en kiuj la ĉefvorto estas E-verteca vorteto: *tre* ***baldaŭ***, *multe* ***pli***, *absolute* ***ĉiam***.

Rekta priskribo de ĉefvorto povas mem esti plurvorta frazparto:

- *la kajero* ***de la juna fraŭlino*** – Ĉefvorto estas *kajero*. *La* estas difina priskribo (= difinilo). *De la juna fraŭlino* estas poseda priskribo. La poseda priskribo estas mem O-vorta frazparto enkondukita per la rolvorteto *de*.
- ***tre alte estimata*** *sinjoro* – La tuto estas O-vorta frazparto. *Sinjoro* estas ĉefvorto. *Tre alte estimata* estas mem A-vorta frazparto, kiu rekte priskribas la ĉefvorton *sinjoro*.

Legu pli pri la diversaj manieroj rekte priskribi ĉefvorton en §7, kaj pri perverbaj (nerektaj) priskriboj en §25.1.

# 4. O-vortoj

## 4.1. Bazaj reguloj por O-vortoj

Vorton kun la finaĵo O oni nomas O-vorto. O-vortoj rolas precipe kiel subjekto kaj objekto, sed ili povas roli en multaj aliaj manieroj (§4.2).

O-vortoj estas nomoj de aferoj, konkretaĵoj, abstraktaĵoj, homoj, bestoj, fenomenoj, agoj, kvalitoj, specoj, individuoj k.t.p.:

- *tablo* = nomo de konkretaĵo
- *hundo* = nomo de bestospeco
- *saĝo* = nomo de kvalito
- *amo* = nomo de sento
- *kuro* = nomo de ago
- *martelado* = nomo de agado
- *Petro* = nomo de persono
- *Berlino* = nomo de urbo

Post O-finaĵo povas sekvi J-finaĵo por multe-nombro (§8), kaj N-finaĵo por frazrolo (§12.2). Oni ankaŭ povas meti ambaŭ, sed ĉiam J antaŭ N:

| | | | |
|---|---|---|---|
| *tablo* | *tabloj* | *tablon* | *tablojn* |
| *hundo* | *hundoj* | *hundon* | *hundojn* |
| *kuro* | *kuroj* | *kuron* | *kurojn* |

Oni povas anstataŭigi la finaĵon O per apostrofo (§10), sed nur kiam ne sekvas J aŭ N: *hund'* = *hundo*, *saĝ'* = *saĝo*, *am'* = *amo*, *kur'* = *kuro*, *Berlin'* = *Berlino*.

Legu ankaŭ pri O-vortaj frazpartoj en §7.1, kaj pri propraj nomoj en §35.

## 4.2. Uzo de O-vortoj

Frazparto, kies ĉefa vorto estas O-vorto, estas nomata O-vorta frazparto. O-vortaj frazpartoj rolas en frazoj precipe kiel subjekto, objekto, alvoko aŭ komplemento, sed ili ankaŭ povas roli kiel priskribo de alia vorto.

### O-vortaj frazpartoj kiel subjekto

- ***La bona virino** trankviligis sian soifon.* FE.15
- *Sur la korto staras **koko** kun tri kokinoj.* FE.33

Legu pli pri subjekto en §12.1.1.

### O-vortaj frazpartoj kiel objekto

- *Mi prenis **broson** kaj purigis **la veston**.* FE.39
- *Mi vidas **leonon**.* FE.7

Legu pli pri objekto en §12.2.2.

### O-vortaj frazpartoj kiel alvoko

- ***Ludoviko**, donu al mi panon.* [FE.8]
- *Vi parolas sensencaĵon, **mia amiko**.* [FE.35]

Legu pli pri alvoko en §12.1.2.

### O-vortaj frazpartoj kiel komplemento

- ***Sur la fenestro** kuŝas krajono kaj plumo.* [FE.6]
- *Li staris **tutan horon** apud la fenestro.* [FE.26]
- *Mi veturas **al Londono**.* [LR.129]
- *Li amas tiun ĉi knabinon **pro ŝia beleco kaj boneco**.* [FE.35]

Legu pli ĉe la diversaj rolmontriloj en §12.

### O-vortaj frazpartoj kiel priskribo

- *La dentoj **de leono** estas akraj.* [FE.7]
- *Glaso da vino estas glaso plena **je vino**.* [FE.32]
- *Pli proksime **al la fenestroj** [...] prenis al si lokon laboristinoj pli junaj.* [M.112]
- *Aŭgusto estas **mia plej amata filo**.* [FE.22]

Legu pli ĉe la diversaj rolmontriloj en §12. Legu ankaŭ pri perverba priskribo en §25.1.

## 4.3. Seksa signifo de O-vortoj

En Esperanto ne ekzistas gramatika sekso. Sekso estas nur parto de la signifo de iuj O-vortoj. La finaĵo O neniel esprimas sekson.

La signifon de vorto oni ĉiam devas lerni. Por ĉiu besta kaj homa vorto oni devas lerni la eventualan sekson kiel parton de la signifo. Neniaj reguloj decidas pri tio. Regas iom da konfuzo pri tio ĉi, kaj multaj vortoj bedaŭrinde havas neklaran signifon.

Ekzistas en Esperanto tri signifoklasoj de vortoj por homoj kaj bestoj: **sekse neŭtralaj radikoj**, **virseksaj radikoj** kaj **inseksaj radikoj**:

- **Sekse neŭtralaj radikoj:**
  - Ĝeneralaj bestaj kaj homaj radikoj: *besto*, *homo*, *infano*, *orfo*, *persono*, *birdo*, *fiŝo*, *insekto*, *reptilio*, *simio* k.a.
  - La sufiksoj *-an-*, *-estr-*, *-id-*, *-ist-* kaj *-ul-*.
  - Participoj kun O-finaĵo: *...anto*, *...into*, *...onto*, *...ato*, *...ito*, *...oto*.
  - Ĉiuj bestospecioj: *ansero*, *araneo*, *bovo*, *ĉevalo*, *ezoko*, *formiko*, *hundo*, *kato*, *koko*, *leono*, *lupo*, *muŝo*, *pasero*, *zebro* k.a.
  - Diversaj ne-familiaj homaj rilatoj: *amiko*, *ĉefo*, *gasto*, *kamarado*, *kolego*, *membro*, *najbaro* k.a.
  - Profesioj kaj diversaj homaj roloj: *aktoro*, *fripono*, *geografo*, *heroo*, *kelnero*, *majstro*, *mastro*, *ministro*, *monarĥo*, *moŝto*, *nobelo*, *pasaĝ-*

*ero*, *redaktoro*, *samurajo*, *sekretario*, *sklavo*, *studento*, *ŝoforo*, *tajloro*, *turisto*, *viktimo* k.a.

- Militistoj: *adjutanto*, *generalo*, *kapitano*, *kaporalo*, *kolonelo*, *leŭtenanto*, *oficiro*, *soldato* k.a.
- Diversaj religiuloj: *pastro*, *ajatolo*, *bonzo*, *derviŝo*, *diakono*, *episkopo*, *imamo*, *kardinalo*, *katoliko*, *papo*, *rabeno* k.a.
- Gentoj, landanoj, rasoj k.s.: *anglo*, *arabo*, *ĉino*, *japano*, *ruso*, *svedo*, *apaĉo*, *cigano*, *judo*, *lapono*, *slavo*, *indiĝeno* k.a.

▸ **Viraj radikoj:**

- Diversaj evidente viraj radikoj: *viro*, *masklo*, *bubo*, *fraŭlo*, *ĝentlemano*, *knabo*, *sinjoro* k.a.
- La sufikso *-ĉj-*.
- Familiaj radikoj: *avo*, *edzo*, *fianĉo*, *filo*, *frato*, *kuzo*, *nepo*, *nevo*, *onklo*, *patro*, *vidvo* k.a. (sed *orfo* kaj ankaŭ la ĝenerala vorto *parenco* estas neŭtralaj).
- Nobeloj kaj similaj altranguloj: *barono*, *caro*, *duko*, *emiro*, *grafo*, *kavaliro*, *princo*, *reĝo*, *ŝaho*, *ŝoguno* k.a. (sed la ĝenerala vorto *nobelo* kaj la vorto *monarĥo* estas neŭtralaj).
- Kelkaj religiuloj: *abato*, *monaĥo*.
- Specialaj virbestaj radikoj: *boko*, *kapono*, *okso*, *stalono*, *taŭro* k.a.

▸ **Inaj radikoj:**

- Evidente ina: *femalo*.
- La sufiksoj *-in-* kaj *-nj-*.
- Mitaj aŭ fabelaj estaĵoj, kiuj laŭ la tradiciaj rakontoj estas inaj: *amazono*, *furio*, *muzo*, *nimfo*, *sireno* k.a.
- Diversaj sociaj roloj (plejparte historiaj): *almeo*, *damo*, *hetajro*, *matrono*, *meretrico*, *primadono*, *putino*, *subreto* k.a.
- Specialaj radikoj por inseksaj bestoj: *guno*, *pulardo* k.a.

El la tri grupoj la neŭtrala estas sendube la plej granda. Ĝi estas nefermita klaso, kiu daŭre akceptas novajn membrojn. La vira grupo estas multe pli malgranda, kaj estas pli fermita. La ina grupo estas la plej malgranda. Eventuale ĝi povas akcepti pliajn membrojn.

Estas tute klare, ke ĉiuj tri kategorioj ekzistas. Sed oni povas malkonsenti pri tio, precize kiuj vortoj troviĝu en kiu grupo. Tio estas tamen afero de detaloj, ne de principoj.

La klasado prezentita ĉi-antaŭe neniel pretendas esti io perfekta aŭ deviga por aliaj. La lingvo estas ĉi-kampe neunueca, kaj ne ekzistas ia simpla vero pri ĉiuj ĉi tiaj radikoj. Kompreneble ĉi tie temas nur pri Esperanto kaj Esperantaj vortoj. En aliaj lingvoj estas alie, kaj iliaj respondaj vortoj povas havi aliajn signifojn kaj uzojn.

### Seksaj afiksoj

Per la sufikso IN (§38.2.20) oni povas doni inan sekson al vorto: *knabino*, *studentino*, *hundino*. Se la radiko estas vira, oni devas aldoni IN, kiam temas pri ino: *Ŝi estas **reĝino**.* Ĉe neŭtrala radiko oni povas aldoni IN, se oni volas klare montri, ke temas pri ino, sed tio ne estas deviga: *Ŝi estas **aktor(in)o**.* Se jam la radiko estas ina, oni kompreneble ne aldonu IN: *Ŝi estas mia **damo**.*

Per la radiko VIR uzata prefiksece aŭ A-vorte (§38.4.1) oni povas doni viran sekson al vorto: *virleono*, *virhundo*, *virhomo*, *vira studento*. Ĉe neŭtrala radiko oni povas aldoni VIR- aŭ *vira*, se oni volas klare montri, ke temas pri viro: ***Virhundoj** agas alie ol hundinoj. Tiu rolo estas por **vira aktoro**.* Se jam la radiko estas vira, oni kompreneble ne aldonu VIR: *Li estas **reĝo**.* Se la radiko estas ina, oni principe povas aldoni VIR- aŭ *vira* por krei viran signifon, sed praktike tio apenaŭ okazas. Anstataŭ VIR aŭ *vira* iuj esperantistoj uzas la proponitan virseksan sufikson IĈ° (§39.1.13).

Per la prefikso GE (§38.3.6) oni povas doni ambaŭseksan signifon al vorto: *gehomoj*, *geviroj*, *gestudentoj*, *gehundoj*. Se la radiko estas neŭtrala, GE normale estas superflua, sed povas esti uzata por emfazi, ke ambaŭ seksoj ĉeestas. Kutime oni ne uzas GE antaŭ inaj radikoj, sed nur antaŭ viraj aŭ neŭtralaj.

Vortoj faritaj per la sufikso ĈJ (§38.2.6) havas viran signifon. Vortoj faritaj per la sufikso NJ (§38.2.25) havas inan signifon.

### Laŭkuntekste vira signifo

En la tradicia lingvouzo oni rutine aldonas la sufikson IN al la plej multaj neŭtralaj radikoj, kiam oni parolas pri ino, kvankam tio principe ne estas necesa. Aliflanke oni tradicie ofte ne montras virseksecon, eĉ kiam tio povus esti bezonata. Oni kontrastigas inter ekz. *bovo* kaj *bovino*, *koko* kaj *kokino*, *ĉino* kaj *ĉinino*, *svedo* kaj *svedino*, *kuracisto* kaj *kuracistino*, *lernanto* kaj *lernantino* k.t.p., tiel ke *bovo*, *koko*, *ĉino*, *svedo*, *kuracisto* kaj *lernanto* ŝajnas viraj. Tiam la kunteksto (kontrasto kun ina vorto) momente donas viran signifon al vorto, kiu per si mem estas neŭtrala. Tio estas eble mallogika, sed tamen ankaŭ praktika. Temas pri ekonomia esprimomaniero. En multe-nombro tamen tiaj vortoj restas neŭtralaj: Vortoj kiel *bovoj*, *kokoj*, *ĉinoj*, *svedoj*, *kuracistoj*, *lernantoj* k.t.p. normale inkluzivas kaj virojn kaj inojn. Oni ne bezonas aldoni la prefikson GE. Efektive nur ĉe la multe-nombra formo oni povas klare vidi, ĉu temas pri neŭtrala aŭ vira radiko. Firme viraj radikoj neniam estas uzataj sensekse en multe-nombro. Vortoj kiel *patroj*, *knaboj*, *onkloj* kaj *bokoj* ĉiam montras nur virojn aŭ virbestojn.

Aliflanke, multaj firme neŭtralaj vortoj, ekz. *homo*, *persono*, *infano*, *parenco*, *membro*, *pasaĝero*, *demokrato*, *turisto*, *besto*, *formiko*, *muŝo* k.a., apenaŭ iam estas uzataj kun virseksa signifo. Oni ne parolas pri ekz. **homo kaj homino**, **persono kaj personino**, **infano kaj infanino**, celante, ke *homo*, *persono* kaj *infano* estu komprenataj vire. Entute vortoj kiel *homino*, *personino* kaj *infanino* estas tre maloftaj. Iuj eĉ opinias, ke tiaj vortoj estas eraraj. Tio tamen estas troigo. En iaj specialaj kuntekstoj povas esti tute konvene paroli pri ekz. *homino* aŭ *infanino*.

Ekde la malfrua 20-a jarcento pli kaj pli da parolantoj ĉesis rutine aldoni IN al neŭtralaj radikoj, kiam ili parolas pri ino. Ĉe tiuj parolantoj la neŭtraleco de tiaj radikoj estas do klare rimarkebla ankaŭ en la unu-nombra uzo. Dume ĉe tiuj parolantoj, kiuj restas ĉe la tradicia kutimo rutine aldoni IN ĉiam, kiam tio estas ebla, la neŭtraleco de tiaj radikoj estas rimarkebla ĉefe ĉe la multe-nombra formo. Tiel povas ŝajni, ke la tradiciemuloj uzas multe pli da radikoj kun virseksa signifo. Tio povas krei la impreson, ke ekzistas grandskala malunueco pri la klasado de la radikoj. Sed fakte temas nur pri diversaj uzokutimoj de la sufikso IN.

Ĉiu plene rajtas daŭrigi la tradician kvazaŭ-viran uzadon de neŭtralaj vortoj, sed ĉiu ankaŭ rajtas uzadi neŭtralajn vortojn plene sensekse. La du manieroj uzi la neŭtralajn vortojn ne vere konfliktas inter si. Ili ambaŭ estas konformaj al la reguloj de la lingvo kaj pravigeblaj per la lingva tradicio. Temas simple pri personaj preferoj, ĉu insisti pri sekso aŭ ne. Por iuj personoj sekso ne estas nepra kaj grava informero, por aliaj ĝi tre ofte estas grava.

## Malklara klasado

Ĉe iuj radikoj la efektiva lingvouzo tute klare fiksis la seksan signifon de la radiko. Ekzemple vortoj kiel *patro*, *viro*, *knabo*, *sinjoro* kaj *reĝo* estas klare virseksaj, vortoj kiel *homo*, *persono*, *infano*, *parenco*, *membro* kaj *besto* estas klare sekse neŭtralaj, kaj *femalo* kaj *damo* estas klare inaj. Sed la klasado ne ĉiam estas tiel klara.

Iuj radikoj montras homan rolon, kiu estas plej ofte okupata de viroj, kvankam nenio vere malebligas virinon en tia rolo. Tre frapa ekzemplo estas la vortoj *soldato* kaj *pastro*. Por tiuj, kiuj konas nur virajn soldatojn kaj nur virajn pastrojn, tiuj radikoj povas ŝajni per si mem klare viraj, sed en iuj landoj ja ekzistas ankaŭ inaj soldatoj kaj inaj pastroj. En la ĉi-antaŭaj listoj *soldato* kaj *pastro* estas klasitaj kiel neŭtralaj. Tiuj du radikoj estas nur ekzemploj de la multaj okazoj, en kiuj la klasado estas tre malfacila. Ĝenerale la ĉi-antaŭaj listoj sekvas la principon, ke radikoj kun malklara, neunueca aŭ ŝanceliĝanta signifo estas klasataj kiel sekse neŭtralaj radikoj.

Kelkaj tradiciaj sociaj roloj ĝis nun neniam estis okupitaj de virinoj, ekzemple la roloj de papo, kardinalo, ajatolo, ŝaho aŭ ŝoguno. Kiam tiuj radikoj estas uzataj por paroli pri la efektiva realeco aŭ la oficiala historio, oni pro sociaj faktoj komprenas, ke temas pri viroj. Sed estas necese distingi sociajn faktojn disde lingva signifo. Oni ja povas ankaŭ uzi la lingvon por paroli pri fikcio aŭ pri ne vaste akceptataj historiaj hipotezoj. Krome la sociaj faktoj povos ŝanĝiĝi en la estonteco. Tamen, ĉar oni tre malofte uzas tiujn vortojn por fikcioj aŭ hipotezoj, laŭ kiuj ankaŭ virinoj alprenas tiujn sociajn rolojn, ne estas klare, ĉu en tiuj situacioj estas eble uzi la radikon sen la sufikso IN (kio donas al la radiko neŭtralan sencon) aŭ ĉu oni devas aldoni IN (kio donas la impreson, ke la radiko estas virseksa). En la ĉi-antaŭaj listoj, la religiaj postenoj kiel *papo*, *kardinalo* kaj *ajatolo* estas prezentitaj kiel sekse neŭtralaj, sekvante la modelon de la vorto *pastro*, dum la ekster-eŭropaj nobelaj titoloj kiel *ŝaho* kaj *ŝoguno* aperas kiel virseksaj, sekvante la modelon de la klare virseksaj eŭropaj nobel-titoloj kiel *reĝo* kaj *duko*. Tamen oni ankaŭ povus klasi tiajn radikojn alimaniere.

Radikoj por supernaturaj kaj fabelaj estaĵoj kiel *dio*, *diablo*, *anĝelo*, *feo*, *koboldo*, *fantomo* kaj *genio* havas tre varian uzon depende de la diversaj tradicioj kaj imagoj pri tiaj estaĵoj. Iuj el ili tamen forte tendencas al vireco, ekzemple *dio* kaj *feo*. Se oni parolas pri inoj, oni do normale uzas *diino* kaj *feino*. Sed la multe-nombraj formoj *dioj* kaj *feoj* ja estas sekse neŭtralaj, kaj tial oni devas rigardi la radikojn kiel sekse neŭtralajn.

Radikoj por mitaj aŭ fabelaj inaj estaĵoj kiel *muzo* kaj *nimfo* estas en la ĉi-antaŭaj listoj klasitaj kiel inaj radikoj, ĉar en la originaj mitoj ja temas ĉiam nur pri inaj estaĵoj. Sed oni uzas tiajn radikojn ankaŭ por aliaj celoj, ekzemple por metafore paroli pri la ecoj de iu persono, aŭ por nomi similan estaĵon en nova fikciaĵo. Tiam temas pri homoj aŭ fikciaj estaĵoj, kiuj dividas nur kelkajn el siaj ecoj kun la estaĵoj el la tradicia mito. Tiam la sekso ne nepre devas esti inter tiuj ecoj, kiuj restas el la mito. Sekve oni ankaŭ povas uzi tiajn radikojn kun sekse neŭtrala interpreto.

Legu ankaŭ pri eventuala sekso de UL kaj aliaj similaj sufiksoj en §38.2.30.

## Evoluo

La signifo de radiko ne estas ŝtone fiksita. La lingvo povas evolui, kaj ankaŭ fakte evoluas kaj ŝanĝiĝas. Multaj vortoj, kiuj antaŭe estis uzataj preskaŭ ĉiam kun vira signifo, estas nun pli kaj pli uzataj kun neŭtrala signifo. Precipe ĉe profesioj la evoluo de la modernaj socioj ĉiam pli kreas bezonon de vortoj neŭtralaj. Sed estas evidente, ke tiu evoluo ne povas trafi ĉiujn vortojn. La signifo de oftaj viraj vortoj kiel *patro*, *viro*, *knabo*, *sinjoro*, *reĝo* k.a., tre malfacile ŝanĝiĝos. Ili estas kaj kredeble restos viraj. Ankaŭ kelkaj inaj radikoj kiel *damo* kaj *subreto* havas tre firman signifon, kaj estas malfacile imagi, ke ili iam fariĝos sekse neŭtralaj.

Ĝenerale estas konsilinde ne provi ŝanĝi, reformi aŭ modifi la seksan signifon de radikoj, por kiuj la uzado kaj signifo estas stabilaj kaj klaraj, ĉar tio nur pliigus la konfuzon. Sed en ĉiuj okazoj, en kiuj la signifo estas malklara, neunueca aŭ ŝanceliĝanta, estas konsilinde doni al la radiko neŭtralan signifon.

Multaj opinias, ke Esperanto diskriminacias virinojn, ĉar iuj vortoj estas baze viraj. Rigardante la ĉi-antaŭajn listojn oni tamen vidas, ke plej multaj vortoj estas (aŭ almenaŭ povas esti) neŭtralaj. Oni do tute rajtas diri ekz. *Ŝi estas **ŝoforo***, ĉar la radiko ŜOFOR per si mem estas neŭtrala. Iuj tamen plu insistas ĉe tiaj vortoj ĉiam uzi IN, se temas pri ino. Tiam estas diskriminacia ne la lingvo, sed (eventuale) la lingvouzantoj.

Ĉe la sufiĉe malgranda grupo de vere viraj vortoj oni tamen devas uzi IN-sufikson, kiam temas pri ino: *edzino*, *fratino*, *reĝino* k.t.p.

Ekde la 2010-aj jaroj aldoniĝis pli kaj pli al tiu ĉi diskuto la fakto, ke iuj homoj rigardas sin kiel “neduumajn”, t.e. nek kiel virojn, nek kiel virinojn, aŭ eble kiel sekse ambiguajn.

Kelkaj nun uzas la prefikson GE por doni sekse neŭtralan sencon al viraj vortoj: *gepatro*, *geedzo* k.s. (§38.3.6) donante al la prefikso GE- iom pli vastan sencon. Ankoraŭ aliaj ekuzas tute novajn sekse neŭtralajn vortojn

samcele, ekz. *parento*° anstataŭ *patro*/*patrino*, kaj *spozo*° aŭ *eŝo*° por *edzo/edzino*. Tiaj sekse neŭtralaj vortoj estas uzeblaj egale por viroj, virinoj kaj neduumaj homoj. Ankoraŭ aliaj simple donas al vortoj kiel *patro* kaj *edzo* sekse neŭtralan sencon (§39.1.13). Tiaj signifoŝanĝoj tamen povas kaŭzi gravajn miskomprenojn.

Legu ankaŭ pri la proponita virseksa sufikso IĈ° en §39.1.13, la sekse neŭtrala unu-nombra pronomo *ri*° (§11.5) kaj la nove proponita sufikso IP°, kiu montras, ke la persono estas "neduuma" (§39.1.18).

# 5. A-vortoj

## 5.1. Bazaj reguloj por A-vortoj

Vorton kun la finaĵo A oni nomas A-vorto. A-vortoj montras ecojn, kvalitojn, apartenojn, rilatojn k.s. A-vortoj estas uzataj por priskribi (§5.2). La A-finaĵo aldonas la ĝeneralan ideon "karakterizata de tio, kion esprimas la radiko":

- *longa* = havanta multe da longo
- *ruĝa* = havanta ruĝon kiel econ
- *bona* = karakterizata de bono
- *inteligenta* = havanta inteligenton, karakterizata de inteligento
- *homa* = rilata al homoj
- *malaperinta* = tia, ke ĝi jam malaperis

La signifo de A-vorto dependas kaj de la radiko, kaj de la kunteksto (§37.2.2).

Ankaŭ posedaj pronomoj (§11.2) kaj vicordaj nombrovortoj (§23.4) estas A-vortoj. En ili la A-finaĵo havas specialan signifon.

Post A-finaĵo povas sekvi J-finaĵo por multe-nombro (§8), kaj N-finaĵo por frazrolo (§12.2). Oni ankaŭ povas meti ambaŭ, sed ĉiam J antaŭ N:

| | | | |
|---|---|---|---|
| *longa* | *longaj* | *longan* | *longajn* |
| *ruĝa* | *ruĝaj* | *ruĝan* | *ruĝajn* |
| *mia* | *miaj* | *mian* | *miajn* |
| *sesa* | *sesaj* | *sesan* | *sesajn* |

Legu ankaŭ pri A-vortaj frazpartoj en §7.2.

## 5.2. Uzo de A-vortoj

A-vortoj estas uzataj precipe por priskribi O-vortojn. Rekte priskribantaj A-vortoj staras plej ofte antaŭ la priskribata O-vorto, sed ili povas stari ankaŭ post ĝi. Eĉ povas esti A-vortoj samtempe antaŭ kaj post la sama O-vorto:

- ***granda** domo*
- *domo **granda***
- *la tago **longa***
- *la **longa** tago*
- ***fama franca** verkisto*
- ***fama** verkisto **franca***

A-vorto, kiu staras post sia O-vorto, estas ofte emfazita: §7.1.

A-vorto povas ankaŭ priskribi ion pere de verbo (§25.1):

- *La <u>domo</u> estas **granda**. Granda* priskribas la O-vorton *domo* pere de la verbo *estas*.

- *Tiuj ĉi verkistoj estas **famaj**. Famaj* priskribas la O-vorton *verkistoj* pere de *estas*.
- *Mi farbis mian domon **blanka**. Blanka* priskribas la O-vorton *domon* pere de la verbo *farbis*.

A-vortoj estas uzataj ankaŭ por priskribi pronomojn (§11) kaj aliajn O-vortecajn vortetojn (§15), ordinare pere de verbo:

- *Mi estas **feliĉa**.*
- *Tiu estas **mia**.*
- *Tio estas **bona**.*
- *Ili fariĝis **koleraj**.*
- *Ambaŭ ŝajnis **dormantaj**.*
- *Estu **singarda(j)**! = Vi estu **singarda(j)**.* Ĉe U-verboj oni tre ofte forlasas la subjekton (§32.3), se ĝi estas la pronomo *vi* (§11.4).

Krome A-vortoj estas uzataj, kiam priskriba verbo kiel *esti* (§25.1.1) havas I-finaĵon (§27), kaj la priskribata senca subjekto de la I-verbo (§27.1) estas nur subkomprenata. Plej ofte la senca subjekto estas ĝenerala nepreciza *oni*:

- *Por esti **feliĉa**, oni devas esti antaŭ ĉio kontenta je sia sorto* [DL.30] *= Por ke oni estu **feliĉa** ...*
- *Tion ĉi mi nomas esti **honesta**.* [Rt.26] *= ... ke oni estas **honesta**.*
- *Plej bone estas traduki ilin* [du grekajn vortojn] *per du vortoj (esti **pia**, esti **feliĉa**).* [LR.4B] Tiuj estas la bazaj formoj, el kiuj oni povas fari ekz. *li estas **pia**, ili estos **feliĉaj*** k.s.
- *Ho, kreski, kreski, fariĝi **granda** kaj **maljuna**, tio estas la sola bela afero en la mondo!* [FA2.43] *= ... ke oni kresku, ke oni fariĝu **granda** kaj **maljuna** ...*

Iafoje nepriskriba I-verbo povas aperi kun A-vorta priskribo (§25.1.1) de subkomprenata senca subjekto: *Promeni **nuda** tra la stratoj estas tre embarase. = Ke oni promenas tra la stratoj, kiam oni estas **nuda**, estas tre embarase.*

## O-vorteca uzo de A-vortoj

Kiam A-vorto rolas kiel rekta priskribo de O-vorto (§7.1), oni iafoje forlasas la O-vorton. Tiam la A-vorto kvazaŭ mem transprenas la rolon de ĉefvorto, kaj rolas **O-vortece**. Tio estas ebla, kiam la kunteksto klare montras, kiu O-vorto estu subkomprenata. Subkomprenado de O-vorto faciliĝas, se antaŭ la A-vorto aperas *la* aŭ alia difinilo (§9):

- *La palaco de la imperiestro estis **la plej belega*** [palaco] *en la mondo.* [FA2.24]
- *Mi legas al vi nur **la plej delikatan*** [parton]. [Rt.6]
- *Mi ne donos al vi manĝi, ĝis vi pagos por **la antaŭa*** [manĝo]. [Rz.22]
- *Vi ne estas **la unuaj*** [personoj], *kiujn mi vidas hodiaŭ matene.* [BV.28]
- *Mi devis oferi **la agrablan*** [aferon, eblon] *pro **la utila*** [afero, eblo]. [OV.266]

- *Ĉiuj homoj certigis, ke ili ĝin legis kaj komprenis, ĉar alie oni ja rigardus ilin kiel **malsaĝajn*** [homojn]. [FA2.29]
- *Rekta vojo estas pli mallonga, ol **kurba*** [vojo]. [FE.33]
- *Ni ambaŭ volas **la saman*** [aferon]. Se la tute ĝenerala ideo *afero* estas subkomprenata post *la sama*, oni povas anstataŭe diri *la samo*: *Ni ambaŭ volas **la samon**. / Ŝi volas scii, kial, kaj por kio, kaj kiarajte,* [...] *kaj denove, kaj denove, kaj ankoraŭ unu fojon denove **la samon**!* [Gm.67]

En esprimoj de horo (§23.8) kaj dato (§23.9) oni preskaŭ ĉiam forlasas la O-vortojn *horo*, *tago* kaj *jaro*. Tiam vicordaj nombrovortoj (§23.4) ekrolas O-vortece:

- *Hodiaŭ estas **la dudek sepa** (tago) de Marto.* [FE.12]
- *Georgo Vaŝington estis naskita **la dudek duan*** [tagon] *de Februaro.* [FE.12]
- *Estas **la dek-unua*** [horo] *kaj duono.*
- *Tio okazis en Julio* [de la] ***mil naŭcent tridek oka*** [jaro]. Ĉe jaresprimo oni nuntempe preferas forlasi ankaŭ la A-finaĵon: *Tio okazis en Julio **mil naŭcent tridek ok**.*

En lingvonomoj kiel *la angla lingvo* kaj *la nederlanda lingvo* (lingvoj nomataj laŭ popolo aŭ lando/regiono, §35.4), oni plej ofte forlasas la vorton *lingvo*, uzante la A-vorton O-vortece: *Ŝi parolas la anglan kaj la nederlandan.*

Ĉe posedaj pronomoj (§11.2) oni ofte forlasas O-vorton, se la kunteksto permesas:

- *Via pano estas malpli freŝa, ol **mia*** [pano]. [FE.10]
- *Kial al li estus permesite ekspluati por si kaj por **la siaj*** [homoj] *ĉion.* [M.36]
- *Vi ankaŭ min redonu al **la miaj*** [homoj]. [IT.7]

Pri la uzo aŭ neuzo de *la* antaŭ posedaj pronomoj (kun aŭ sen posta O-vorto) legu pli detale en la klarigoj pri posedaj pronomoj kiel difiniloj (§9.2).

### *Alia*

La A-vorto *alia* estas ofte uzata O-vortece. Oni povus imagi subkomprenatan O-vorton, sed *alia* ofte komplete transprenas la rolon de O-vorto, kaj enŝovo de O-vorto estas iafoje tute superflua:

- *Mi ne volas tiun ĉi supon, donu al mi **alian*** [supon]. [Rz.27]
- *Ŝi estas jam edzino de **alia*** [viro]*!* [H.15]
- ***Alian*** [homon] *ne mallaŭdu, vin mem ne aplaŭdu.* [PE.781]
- *El ŝiaj multaj infanoj **unuj*** [infanoj] *estas bonaj kaj **aliaj*** [infanoj] *estas malbonaj.* [FE.12]
- *Laboru en konsento kaj helpu **unu*** [persono] *al la **alia*** [persono]. [OV.141] Legu pli pri la esprimo *unu ... (la) alia* en §23.1.3.

*Alia* plej ofte esprimas individuecan signifon. *Alia* tiam tre similas al la tabelvortoj je U (§15.1). Tial iuj eĉ proponis ŝanĝi la A-vorton *alia* en tabelvorton, kio estas tamen evitenda reformprovo (§13.3).

La kvantaj A-vortoj *multaj*, *malmultaj*, *pluraj* kaj *kelkaj* estas ofte O-vortece uzataj (§24.2).

# 6. E-vortoj

## 6.1. Bazaj reguloj por E-vortoj

Vorton kun la finaĵo E oni nomas E-vorto. E-vortoj rolas kiel komplementoj kaj en diversaj aliaj frazroloj (§6.2). Ili montras manierojn, lokojn, tempojn, kvantojn k.s.:

- *rapide* = en rapida maniero, kun rapido
- *bele* = en bela maniero, kun belo
- *urbe* = en (la) urbo(j), en urba maniero
- *hejme* = en la propra(j) hejmo(j)
- *tage* = en (la) tago(j)
- *matene* = en (la) mateno(j)
- *lunde* = en la lundoj, en lundoj, en ĉiu lundo, en iu lundo, en lunda maniero
- *normale* = en normala maniero, en normalaj okazoj
- *multe* = en granda kvanto
- *alveninte* = post (la) alveno

La signifo de E-vorto dependas kaj de la signifo de la radiko, kaj de la kunteksto (§37.2.3).

Ĉe lokaj E-vortoj povas aperi la finaĵo N por direkto (§12.2.5): *urben* = "al la urbo(j)", *hejmen* = "al la propra(j) hejmo(j)". Sed E-vorto neniam povas ricevi J-finaĵon.

En tempaj komplementoj *lunde* kaj *lundon* havas malsamajn sencojn: §12.2.4.

Legu ankaŭ pri E-vortaj frazpartoj en §7.3.

## 6.2. Uzo de E-vortoj

### E-vortoj kiel komplementoj

E-vorto povas roli kiel komplemento de verbo:

- *La policano <u>kuras</u> **rapide**.* [Rz.16] *Rapide* estas komplemento de *kuras*, kaj montras la manieron de kurado.
- *Ŝi <u>sidas</u> **hejme**.* [Rn.17] *Hejme* estas komplemento de *sidas*, kaj montras la lokon de la sidado.

E-vorta komplemento povas ankaŭ rilati al tuta frazo:

- ***Kompreneble** <u>mi iros</u>.* *Kompreneble* rilatas al la tuta frazo. Ĝi ne montras la manieron de irado, sed komentas la fakton, ke mi iros. Tiu tuta fakto estas komprenebla. Oni povas la samon esprimi per pli kompleta frazo: *Estas **kompreneble**, <u>ke mi iros</u>*. En la Fundamento aperas la jena meza formo kun *ke*, sed sen *estas*: ***Kompreneble**, <u>ke mi lin amas</u>*. [FE.41]

- ***Milde dirite**, tio estas iom ĝena.* = *Estas **milde dirite**, ke tio estas iom ĝena.*

Kiam E-vorto tiamaniere rilatas al frazo kiel tuto, estas konsilinde apartigi ĝin per komo (kiel en la ĉi-antaŭa ekzemplo kun *milde dirite*), kaj per eta paŭzo en la elparolo. Sed kiam temas pri tre kutima esprimo (kiel en la ĉi-antaŭa ekzemplo kun *kompreneble*), oni ofte skribas sen komo kaj elparolas sen paŭzeto. Sufiĉe ofte tia aparta priskribo eĉ aperas ene de tiu frazo, kiun ĝi priskribas: *Mi **kompreneble** iros. Tio estas, **milde dirite**, iom ĝena.* Komparu kun la uzo de komentofrazoj (§32.2).

## E-vortoj kiel priskriboj

E-vorto povas ankaŭ roli kiel rekta priskribo de A-vorto, de alia E-vorto, aŭ de E-vorteca vorteto:

- *Ĝi estas **sufiĉe** granda. Sufiĉe* estas rekta priskribo de *granda*.
- *Li manĝas **terure** multe. Terure* estas rekta priskribo de *multe*.
- *Ili revenos **treege** baldaŭ. Treege* estas rekta priskribo de *baldaŭ*.

E-vorto povas ankaŭ esti perverba priskribo de I-verbo aŭ de subfrazo (§25.1.1) aŭ de la tuta situacio (en sensubjekta frazo, §25.1.1):

- *Kritiki estas **facile**.* [PE.252] *Facile* perverbe priskribas *kritiki*.
- *Estas **bele** ripozi de siaj faroj!* [FA3.10] *Bele* estas perverba priskribo de *ripozi (de siaj faroj)*.
- *Estas **bone**, ke vi venas!* [FA3.61] *Bone* perverbe priskribas la *ke*-frazon.
- *Estas **mallume**.* [Rz.33] *Mallume* estas perverba priskribo en sensubjekta frazo.

A-vortoj kaj E-vortoj estas tre similaj. La afero, kiun oni volas priskribi, decidas, ĉu oni uzu A-vorton aŭ E-vorton.

## E-vortoj kiel nuanciloj

Iuj E-vortoj povas direkti la atenton al certa frazparto, kaj nuanci ĝian rolon en la frazo. En tia nuanca rolo E-vorto povas rilati al tiaj vortoj, kiujn ĝi normale ne povas priskribi, ekz. O-vortoj kaj personaj pronomoj:

- *Unuj diris **absolute** nenion, aliaj diris tro multe.* [FA3.19] La objekto *nenion* validas senrezerve, senescepte.
- *Li estis **tute** en malespero.* [FA1.122] Ne restis eĉ iomete da espero.
- *Li manĝas multajn diversajn aferojn, sed **ĉefe** legomojn.* La plej gravaj el liaj manĝaĵoj estas legomoj.
- *La najbaroj disiĝis kun larmoj, kaj **precipe** la infanoj ploris maldolĉe.* [FA3.58] Ankaŭ aliaj ploris maldolĉe, sed la infanoj tion faris pli multe.
- ***Ĝuste** apud mia pordego floras la plej belaj rozoj.* [FA2.132] La loka esprimo validas tute precize kaj ekzakte. Ne uzu *ĵus* (§14.2.6) anstataŭ *ĝuste* en ĉi tiaj frazoj.

- *Estu tre singardaj kun Viaj vortoj, ĉar alie Vi atingos* ***ĝuste*** *la malon de tio, kion Vi deziras atingi!* [L2.6] Vi atingos la malon en absoluta senco, ne nur proksimume.
- *La numero videble estis* ***ĝuste*** *tiu, kiun ŝi havis en sia memoro.* [M.18] Ne nur proksimume tiu numero, sed tute ekzakte.
- *Lia tago de naskiĝo* ***ĝuste*** *nun estis festata.* [FA1.87] Ne iom antaŭe aŭ poste, sed vere en tiu momento mem.
- *La tuta ĝojo de la tero flugis for, kaj restis* ***sole*** *ĝemo!* [Rt.75] *= ... restis nenio alia ol ĝemo. ... restis nur ĝemo.* Ĉi tia *sole* estas egala al *nur* (§14.3.14), sed *nur* iafoje havas alian signifon.
- *Li elĵetis la tutan kupran monon kaj plenigis al si la poŝojn kaj la tornistron* ***sole*** *per arĝento.* [FA1.7] Per nenio alia li plenigis ilin. Iafoje povas estiĝi konfuzo inter tiu ĉi nuanca signifo de *sole* kaj ĝia ordinara signifo "sen akompano". Tiam oni ofte povas uzi la A-formon *sola* por "sen akompano": *Ili iris* ***sole*** *tien. = Ili iris nur tien. Ili iris* ***solaj*** *tien. = Ili iris tien sen akompano.*

E-vortecaj vortetoj kiel *ankaŭ*, *eĉ*, *almenaŭ*, *ja* kaj *nur* (§14.3) ofte havas tian nuancan rolon.

## O-vortecaj E-vortoj

Kvantaj E-vortoj povas esti uzataj kvazaŭ ili estus O-vortoj (§24.3): *Sur la arbo sin trovis* ***multe*** *(aŭ multo) da birdoj.* [FE.32]

# 7. Frazpartoj

Frazparto estas grupo de vortoj, kiuj rolas kune en frazo. Frazparto konsistas el ĉefvorto kaj eventualaj rektaj priskriboj de la ĉefvorto. Depende de la ĉefvorto oni parolas pri O-vortaj (§7.1), A-vortaj (§7.2) kaj E-vortaj (§7.3) frazpartoj:

## 7.1. O-vortaj frazpartoj

### Difiniloj

O-vorta frazparto povas havi difinilon (§9) antaŭ si. Difinilo estas vorteto, kiu precizigas aŭ malprecizigas la identecon de la tuta frazparto:

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| ***la*** *nomo* | ***tia*** *nomo* | ***tiu*** *nomo* | ***ties*** *nomo* | ***ĉiu*** *nomo* | ***iu*** *nomo* |
| ***la*** *nomoj* | ***tiaj*** *nomoj* | ***tiuj*** *nomoj* | ***ties*** *nomoj* | ***ĉiuj*** *nomoj* | ***iuj*** *nomoj* |
| ***la*** *nomon* | ***tian*** *nomon* | ***tiun*** *nomon* | ***ties*** *nomon* | ***ĉiun*** *nomon* | ***iun*** *nomon* |
| ***la*** *nomojn* | ***tiajn*** *nomojn* | ***tiujn*** *nomojn* | ***ties*** *nomojn* | ***ĉiujn*** *nomojn* | ***iujn*** *nomojn* |

### Nombrovortoj

Por rekte priskribi O-vorton oni povas uzi nombrajn vortetojn (§23.1), kiuj montras, pri kiom da aferoj temas:

- ***unu*** *tablo*
- ***du*** *pordoj*
- ***tri*** *hundojn*
- ***dudek kvin*** *aŭtoj*
- ***cent mil*** *dolarojn*

### A-vortoj

Por rekte priskribi O-vorton oni uzas precipe A-vortojn (§5). Se la O-vorto havas iun el la finaĵoj J kaj N, ankaŭ la rekte priskribanta A-vorto ricevas tiujn finaĵojn. Rekte priskribanta A-vorto staras normale antaŭ la O-vorto:

- ***granda*** *tablo*
- ***malfermita*** *pordo*
- ***sovaĝaj*** *hundoj*
- ***strangajn*** *okazaĵojn*

Oni povas ankaŭ uzi postmetitajn A-vortojn. Iafoje oni postmetas A-vorton por emfazi ĝin:

- *amo* ***eterna***
- *marteladon* ***bruan***

Alifoje oni postmetas A-vorton por klareco.

## O-vortaj frazpartoj

Oni ankaŭ povas uzi O-vortan frazparton por priskribi O-vorton. Tia priskriba frazparto staras ĉiam post la O-vorto. La priskriba frazparto havas ĉiam rolmontrilon, plej ofte rolvorteton, sed iafoje N-finaĵon:

- *viro* ***kun ĉapelo***
- *junulino* ***el Francujo***
- *instruisto* ***pri la japana lingvo***
- *hundo* ***sen vosto***
- *pordo* ***de malgranda domo***
- *kurado* ***laŭ vojo kampara***
- *skribado* ***per globkrajono***
- *verkado* ***de konataj aŭtoroj***
- *verkado* ***de la libroj***
- *verkanto* ***de libroj***
- *iro* ***en la preĝejon*** [FA4.166]

Rimarku, ke oni ne povas priskribi O-vorton per antaŭmetita O-vorto (sen rolmontrilo). Tiaj priskriboj estas eblaj en iuj lingvoj, ekz. la angla, sed ne en Esperanto. Oni ne diru: **Esperanto kongreso**, **lingvo instruisto**, **Berlino Esperanto-klubo**. Oni devas uzi A-vorton aŭ postmetitan O-vorton kun rolvorteto: *Esperanta kongreso*, *kongreso de Esperanto*, *lingva instruisto*, *instruisto de lingvo(j)*, *Berlina Esperanto-klubo*, *Esperanto-klubo de Berlino*. Ofte oni povas alternative fari kunmetitan vorton (§37.3): *Esperanto-kongreso*, *lingvoinstruisto*.

## Identigaj priskriboj

Post O-vorto povas aperi rekta priskribo, kiu identigas la aferon. Normale temas pri la propra nomo de la afero. Tia identiga priskribo (§25.2) ne havu N-finaĵon aŭ alian rolmontrilon:

- *sinjoro* ***Petro*** [FE.18]
- *la urbo* ***Barcelono*** [OV.391]
- *la monato* ***Majo*** [FA3.18]
- *mia fratino* ***Anastazio*** [FA1.229]
- *la gazeto* ***New York Times***
- *tiu libro* ***Ĉu vi kuiras ĉine?*** (la libro nomiĝas *Ĉu vi kuiras ĉine?*)
- *Neniam uzu la vorton* ***"amo"****.* [OV.383]

## I-verboj

O-vorto povas havi I-verbon kiel rektan priskribon (§27.4), precipe se la O-vorto havas agan signifon:

- *la povon* ***labori*** [M.38]
- *forta deziro* ***venki***

- *ĝojo* ***esti la unua***
- *la neceso* ***eduki infanon***

### Komparaj esprimoj

Oni povas priskribi O-vorton per kompara *kiel*-esprimo (§20.1). Tia priskribo staras ĉiam post la O-vorto:

- *haroj* ***kiel plumoj de korvo*** M.141
- *vizaĝo* ***kiel lakto kaj sango*** FA2.105

En ĉi tiaj esprimoj oni ne uzu *kia* (§20.1.4). Ne diru **haroj kiaj plumoj de korvo**.

### Subfrazoj

Por priskribi O-vorton oni povas uzi subfrazon (§33). La subfrazo ĉiam staras post la O-vorto:

- *Jen estas la pomo,* ***kiun mi trovis****.* FE.6
- *Li rakontis la novaĵon,* ***ke ŝi finfine alvenis****.*

### Lokaj kaj tempaj E-vortoj

Lokaj, direktaj kaj tempaj E-vortoj (kaj E-vortecaj vortetoj) povas aperi kiel postmetita priskribo de O-vorto. Tiam oni subkomprenas *kiu estas*, *kiu troviĝas*, *kiu okazas*, *estanta*, *troviĝanta*, *okazanta* aŭ similan esprimon:

- *La floroj* ***supre*** *sur la tero odoras.* FA1.83 *= La floroj, kiuj troviĝas* ***supre*** *...*
- *El la preĝejo tute* ***apude*** *penetris al li la sonoj de orgeno.* FA3.63 *= El la preĝejo, kiu estis tute* ***apude*** *... El la tute* ***apuda*** *preĝejo ...*
- *La pordo* ***kontraŭe*** *estis ankaŭ malfermata vespere.* FA2.134 *= La pordo, kiu troviĝis* ***kontraŭe*** [= en la kontraŭa domo]*... La* ***kontraŭa*** *pordo ...*
- *La vesperon* ***antaŭe*** *la tuta urbo estis iluminita.* FA1.203 *= La vesperon, kiu estis* ***antaŭe*** *... La* ***antaŭan*** *vesperon ...*
- *Sur mizera lito* ***tie*** *kuŝis la patrino de la infano.* FA3.93 *= Sur mizera lito, kiu troviĝis* ***tie*** *... Sur* ***tiea*** *mizera lito ...*
- *Alie la malfeliĉa blindulino ja neniam povus trovi la vojon* ***hejmen****.* FA3.123 *= ... la vojon, kiu kondukas* ***hejmen****.*
- *La sola afero, kiun ni devas fari, estas: certigi al nia afero regulan senhaltan iradon* ***antaŭen****.* OV.123 *= ... iradon, kiu direktiĝas* ***antaŭen****.*
- *Ŝi kuraĝis entrepreni la vojaĝon* ***ĉi tien****.* FA4.152 *= ... la vojaĝon, kiu kondukis ŝin* ***ĉi tien****.*

Ofte oni ankaŭ povas uzi postmetitan A-vorton kiel lokan aŭ tempan priskribon de O-vorto: *la preĝejo tute* ***apuda***, *la pordo* ***kontraŭa***, *la vesperon* ***antaŭan***, *mizera lito* ***tiea***. Iafoje tio estas pli klara.

Rimarku, ke A-vorta priskribo povas stari ĉu antaŭ, ĉu post la O-vorto, dum tia ĉi E-vorta priskribo nur povas stari post la O-vorto: *la antaŭan vesperon*,

*la vesperon antaŭan*, *la vesperon antaŭe*, sed nepre ne **la antaŭe vesperon**.

Postmetita loka, direkta aŭ tempa priskribo de O-vorto ofte mem havas precizigan priskribon kun rolvorteto. Tiam oni por klareco preferas E-vortan formon: *la floroj* ***supre*** *sur la tero*, *la regionoj* ***sude*** *de Parizo* (ili troviĝas sude de Parizo), *la vesperon* ***antaŭe*** *de la geedziĝo* (la geedziĝo okazos en la posta tago). Se oni uzas A-vorton, oni iafoje povas miskompreni tiel, ke la preciziga priskribo rilatas al la O-vorto, kio povas tute ŝanĝi la sencon: *la regionoj* ***sudaj*** *de Parizo = la sudaj regionoj de Parizo* (la regionoj apartenas al Parizo), *la vesperon* ***antaŭan*** *de la geedziĝo = la antaŭan vesperon de la geedziĝo* (la geedziĝo okazas en tiu vespero). En la lasta ekzemplo oni povas elturnigi per *al* anstataŭ *de*: *la vesperon* ***antaŭan*** *al la geedziĝo* (la geedziĝo okazos en la tago post tiu vespero).

### Ordo de priskriboj de O-vorto

En O-vorta frazparto la rektaj priskriboj ordinare sekvas la jenan ordon:

**difinilo** · **kvantaj priskriboj** · **antaŭpriskriboj** · čefvorto · **postpriskriboj**

Ekzemple: *la du novaj tenisaj pilkoj en tiu kesto*. Tie *pilkoj* estas ĉefvorto, *la* estas difinilo, *du* estas kvanta priskribo, *novaj* kaj *tenisaj* estas antaŭpriskriboj, kaj *en tiu kesto* estas postpriskribo.

### Difinilo

Difinilo = ***la*****, tabelvorto, poseda pronomo,** ***ambaŭ*****,** ***unu***.

Normale oni uzas samtempe nur unu difinilon: ***la*** *domo*, ***tiuj*** *tri domoj*, ***kies*** *grandaj domoj*, ***miajn*** *lignajn domojn*, ***ia*** *stranga domo*, ***ambaŭ*** *domoj*.

La difinilo *tia* iafoje aperas post kvanta priskribo: *multaj* ***tiaj*** *homoj*, *kelkaj* ***tiaj*** *arboj*. La vorteto *tia* iafoje eĉ troviĝas en postpriskriba pozicio, precipe kiam ĝi mem havas subfrazon kiel priskribon: *La arbo de la suno estis belega arbo* ***tia****, kian ni neniam vidis*. [FA3.114] *Tia* estas difinilo de *arbo*. La subfrazo *kian ni ...* priskribas *tia*. *Ĝi estis komercejo* ***tia*** *sama, kiaj estas ĉiuj aliaj komercejoj*. [M.20] Ankaŭ kiam *tia* staras en tiaj pozicioj, ĝi estas difinilo, kaj oni ne uzas *la* kune kun ĝi.

### Kvantaj priskriboj

Kvantaj priskriboj estas ĉefe nombraj vortetoj kaj vicordaj nombrovortoj (§23): *la* ***tridek*** *ruĝaj domoj*, *la* ***dek tri*** *ruĝaj domoj*, *la* ***unua*** *domo*, *mia* ***tria*** *ruĝa domo*.

Ankaŭ iuj tre bazaj A-vortoj, kiel *tuta*, *alia*, *(mal)sama*, *pluraj*, *(mal)multa*, *kelka*, *(antaŭ)lasta* kaj *cetera*, aperas en la pozicio de kvantaj priskriboj: *la* ***tuta*** *ŝtona domo* (ne **la ŝtona* ***tuta*** *domo**), *la* ***alia*** *ŝtona domo* (ne **la ŝtona* ***alia*** *domo**), *la* ***sama*** *ŝtona domo* (ne **la ŝtona* ***sama*** *domo**).

Se oni uzas du aŭ pli da kvantaj priskriboj samtempe, la reciproka ordo normale ne gravas: *la* ***lastaj dek*** *jaroj* aŭ *la* ***dek lastaj*** *jaroj*, *la* ***aliaj du*** *knaboj* aŭ *la* ***du aliaj*** *knaboj*. Sed se oni uzas kaj nombran vorteton, kaj

vicordan nombrovortojn samtempe, oni normale metu la vicordan nombrovorton unue por klareco: *la **unuaj dek** jaroj*.

## Antaŭpriskriboj

Antaŭpriskriboj estas ordinaraj A-vortoj: *la **ruĝa** domo*, *la du **grandaj** domoj*. O-vorto povas havi plurajn antaŭmetitajn A-vortojn: *tiuj dek **grandaj nigraj hindaj** ĉemizoj*. Oni tiam normale metas ĝeneralajn A-vortojn unue (*grandaj*), kaj specialajn A-vortojn laste (*hindaj*).

Iafoje poseda pronomo aperas en la pozicio de ordinaraj A-vortoj. Tiam la poseda pronomo ne estas difinilo: *Krom mi restis ĉe la patrino du **miaj** pli junaj fratoj.* [M.101] Oni povus ankaŭ diri: *... du **el** miaj pli junaj fratoj.*

Antaŭmetita A-vorto povas siavice havi priskribon. Se tiu priskribo staras post la A-vorto, la esprimo ofte fariĝas neklara: *la **farita** el ligno domo*. *El ligno* priskribas la A-vorton *farita*, kiu priskribas la O-vorton *domo*. Pli bone estas meti la priskribon de la A-vorto antaŭ ĝi: *la el ligno **farita** domo*. Sed plej bone estas meti la A-vorton kiel postpriskribon de la O-vorto: *la domo **farita** el ligno*. Se tia priskribo de A-vorto estas tre longa, oni nepre metu la A-vorton post la O-vorto: *la domo **farita** el multekosta brazila ligno de tre alta kvalito*.

## Postpriskriboj

Postpriskribo = A-vorto, I-verbo, *kiel*-komparo, identiga priskribo, frazparto kun rolmontrilo, subfrazo, loka aŭ tempa E-vorto, loka vorteto.

Postpriskriboj estas tre diversspecaj. Por klareco oni malofte uzas pli ol unu postpriskribon samtempe. Se oni tamen uzas pli ol unu postpriskribon, la reciproka ordo dependas de klareco. Se oni ekz. uzas samtempe subfrazon kaj frazparton kun rolmontrilo, tiam la frazparto kun rolmontrilo normale staru antaŭ la subfrazo, sed tia konstruo povas tamen esti malklara: *domo el ligno kiun mi aĉetis*. Ĉu mi aĉetis la domon aŭ la lignon? Por aldona klareco oni povas uzi la difinilon *tiu*. Ĝi montras, al kiu O-vorto la subfrazo rilatas: ***tiu** domo el ligno kiun mi aĉetis*, *domo el **tiu** ligno kiun mi aĉetis*. (En tiu ĉi ekzemplo oni povas elturniĝi ankaŭ per *ligna domo, kiun mi aĉetis* / *domo ligna, kiun mi aĉetis*, se la senco estas, ke mi aĉetis la domon.)

## Nekutima vortordo

Iafoje oni deflankiĝas de la kutima vortordo por speciala emfazo k.s. Tio estas ebla, kiam la diversaj finaĵoj klare montras, kiuj vortoj kunapartenas:

- ***Ĉevalojn** ili tie ĉi havas **tre bonajn**.* [Rz.67] = *Ili tie ĉi havas tre bonajn ĉevalojn.* La N-finaĵo ĉe *bonajn* klare montras, ke ĝi estas rekta priskribo de *ĉevalojn* malgraŭ la nekutima vortordo.
- *Pli da mono ŝi ne havis, kaj **laborenspezon** ŝi havis **nenian**.* [M.178] = *... kaj nenian laborenspezon ŝi havis.*

Unu el la plej ekstremaj ekzemploj de tia ĉi vortordo troviĝas en la Esperanta himno "La Espero": *Ne al glavo sangon soifanta ĝi **la homan** tiras **familion**.* [FK.298] = *Ne al glavo soifanta sangon (kiu soifas/deziras sangon) ĝi*

*tiras* ***la homan familion***. Tian vortordon oni nepre ne uzu en ordinara lingvaĵo.

## 7.2. A-vortaj frazpartoj

### Priskribo per E-vortoj aŭ vortetoj

Por priskribi A-vorton oni uzas normale E-vorton aŭ E-vortecan vorteton. La priskribo staras preskaŭ ĉiam antaŭ la A-vorto:

- ***vere*** *feliĉa*
- ***ekstreme*** *longa*
- ***mirinde*** *bela*
- ***tre*** *feliĉa*
- ***tiel*** *bela*
- ***pli*** *bela*
- ***iom*** *varma*
- ***apenaŭ*** *komprenebla*

Sed se la priskribata A-vorto estas participo (§28), priskribanta E-vorto aperas ĉu antaŭ ĝi, ĉu post ĝi:

- *pekinta* ***senintence*** [FE.22]
- ***multe*** *drinkinta*

### O-vortaj frazpartoj

Oni povas uzi O-vortan frazparton por priskribi A-vorton. La priskribanta frazparto havas ĉiam rolvorteton aŭ N-finaĵon. Se ĝi havas rolvorteton, ĝi staras normale post la A-vorto. Se ĝi havas N-finaĵon, ĝi staras normale antaŭe:

- *longa* ***je dek metroj***
- *legebla* ***sen helpo***
- *scivolema* ***pri ĉio ajn***
- *plena* ***de akvo***
- *farita* ***de mi***
- *legata* ***de multaj homoj***
- *skribita* ***per krajono***
- ***mil metrojn*** *alta*
- ***kelkajn paŝojn*** *distanca*

Se A-vorto esprimas objektan agon, N-finaĵa priskribo montras la objekton de tiu ago (§12.2.2):

- *esprimanta* ***grandan inteligentecon*** [M.41]
- *dirinta* ***la veron*** [FE.24]

### Komparaj esprimoj

Oni povas priskribi A-vorton per kompara esprimo kun *kiel* aŭ *ol* (§20.1). Tia priskribo staras ĉiam post la A-vorto:

- *longa* ***kiel serpento***
- *stulta* ***kiel azeno***
- *feliĉa* ***kiel infaneto***
- *longa* ***kiel tiu ĉi ŝnuro***
- *sama* ***kiel mi***
- *pli longa* ***ol serpento***
- *pli stulta* ***ol azeno***
- *pli feliĉa* ***ol li***

### Subfrazo aŭ I-verbo

Por priskribi A-vorton oni ankaŭ povas uzi subfrazon (§33) kaj I-verbon (§27.4). Tia priskribo staras ĉiam post la A-vorto:

- *Mi estas feliĉa,* ***ke mi vin akceptos***. [LR.112]
- *Ili estis aŭdintaj,* ***ke la reĝo venos viziti***.
- *Mi estas kapabla* ***instrui nur la francan lingvon***. [M.57]

## 7.3. E-vortaj frazpartoj

### Priskribo per E-vortoj aŭ vortetoj

Por priskribi E-vorton oni uzas unuavice alian E-vorton aŭ E-vortecan vort-eton (§14). La priskribo staras preskaŭ ĉiam antaŭ la priskribata E-vorto:

- ***vere*** *rapide*
- ***tre*** *rapide*
- ***ekstreme*** *tede*
- ***pli*** *rapide*
- ***tiel*** *tede*
- ***iom*** *tede*

### O-vortaj frazpartoj

Oni povas uzi O-vortan frazparton por priskribi E-vorton. La priskribanta frazparto havas ĉiam rolvorteton aŭ N-finaĵon. Tia priskribo staras normale post la E-vorto:

- *rilate* ***al tio***
- *rilate* ***tion***
- *pere* ***de li***
- *kaŭze* ***de la akcidento***
- *fare* ***de ili***

Se E-vorto esprimas objektan agon, N-finaĵa priskribo montras la objekton de tiu ago (§12.2.2):

- *subtenante **la kruĉon*** [FE.15]
- *elĵetante **unu serpenton** kaj **unu ranon*** [FE.21]
- *trovinte **pomon*** [FE.22]

Se O-vorta priskribo de E-vorto montras mezuron, ĝi staras normale antaŭ la E-vorto:

- ***je cent decibeloj** laŭte*
- ***cent decibelojn** laŭte*

### Komparaj esprimoj

Oni povas priskribi E-vorton per kompara esprimo kun *kiel* aŭ *ol* (§20.1). Tia priskribo staras ĉiam post la E-vorto:

- *longe **kiel hieraŭ***
- *tede **kiel en la lernejo***
- *same **kiel mi***
- *pli longe **ol hieraŭ***
- *pli tede **ol mia instruisto***

### Subfrazo aŭ I-verbo

Por priskribi E-vortan participon oni ankaŭ povas uzi subfrazon (§33) kaj I-verbon (§27.4). Tia priskribo staras ĉiam post la E-vorto:

- *Vidante, **ke ŝi estas tiel bela**, li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola.* [FE.21]
- *Aleĉjo staris momenton apud la pordo, kvazaŭ ŝanceliĝante, **ĉu li devas resti aŭ iri post la kuzino**.* [M.49]
- *Forgesante **diri adiaŭ al la du virinoj**, li elkuris en la antaŭĉambron.* [M.60]

# 8. Unu-nombro kaj multe-nombro

## 8.1. Bazaj reguloj por nombro

Ĉe O-vortoj (§4) kaj A-vortoj (§5), kaj ĉe tabelvortoj je U kaj A (§13), oni devas fari distingon inter **unu-nombro** kaj **multe-nombro**. Unu-nombro signifas, ke temas pri unu afero. Multe-nombro signifas, ke estas pli ol unu afero.

Gramatikan multe-nombron oni montras per la finaĵo J. Manko de J-finaĵo montras unu-nombron:

| **Unu-nombro** | **Multe-nombro** |
|---|---|
| *(unu) tago* | *(pluraj) tagoj* |
| *(unu) granda domo* | *(tri) grandaj domoj* |
| *ilia granda domo* | *iliaj grandaj domoj* |
| *alia homo* | *aliaj homoj* |
| *la unua tago* | *la unuaj tagoj* |
| *iu* | *iuj* |
| *tiu homo* | *tiuj homoj* |
| *tia speco* | *tiaj specoj* |
| *La kato estas nigra.* | *La katoj estas nigraj.* |
| *Ĝi estas granda, sed bela.* | *Ili estas grandaj, sed belaj.* |
| *Vi estas bela.* | *Vi estas belaj.* |
| *Ĉiu miris pri tio.* | *Ĉiuj miris pri tio.* |
| *Kia estis la respondo?* | *Kiaj estis la respondoj?* |

Eventuala N-finaĵo staras post J: *tagojn*, *grandajn*, *aliajn*, *nigrajn*, *iliajn*, *tiujn*, *neniajn*.

Iaspecan multe-nombrecon esprimas ankaŭ la sufikso AR (§38.2.5).

## 8.2. Uzado de unu-nombro kaj multe-nombro

### 8.2.1. Nombro ĉe radikoj kaj kunmetaĵoj

Radiko (§37.1) povas montri jen unu aferon, jen plurajn aferojn:

- *okula* = rilata al okulo aŭ okuloj. La radiko OKUL mem ne esprimas ian nombron.
- *okule* = rilate al okulo aŭ okuloj
- *okulkavo* = kavo de okulo
- *okulkuracisto* = kuracisto de okuloj
- *kolora* = havanta unu aŭ plurajn kolorojn
- *samideano* = ano de la sama ideo aŭ de la samaj ideoj
- *marteli* = bati per unu martelo aŭ per pluraj marteloj

- *libroverkado* = verkado de libro aŭ libroj

Oni do ne uzas J-finaĵojn ene de kunmetitaj vortoj. Oni ne diras: **okulojkuracisto**, **librojvendejo**, **ŝipojhaveno**, **senharojigi** aŭ simile, sed *okulkuracisto*, *librovendejo*, *ŝiphaveno* kaj *senharigi*, kvankam temas ja klare pri multe-nombraj signifoj: *kuracisto de okuloj*, *vendejo de libroj*, *haveno por ŝipoj*, *forigi harojn*.

J-finaĵo povas tamen aperi en kunskriboj kiel *membroj-abonantoj* (§25.3).

Grupaj radikoj (§8.2.2) kiel FAMILI (aro da parencoj) kaj ARME (aro da soldatoj) montras ĉiam multe-nombron de tio, el kio konsistas la grupo, sed ili ne per si mem montras, ĉu estas unu aŭ pli ol unu tia grupo:

- *familia* = rilata al familio aŭ familioj (rilata al unu aro da parencoj aŭ al pluraj aroj da parencoj)
- *armea* = rilata al armeo aŭ armeoj (rilata al unu aro da soldatoj aŭ al pluraj aroj da soldatoj)

### 8.2.2. Nombro ĉe O-vortoj

Plej multaj O-vortoj estas nomoj de individuecaj aferoj, kiuj povas esti nombrataj. Povas esti unu aŭ pli multaj de la afero: *tablo*, *domo*, *knabino*, *ĉevalo*, *vintro*, *metro*, *iro*, *preno*.

Kiam estas pli ol unu, oni aldonas la finaĵon J: *tabloj*, *domoj*, *knabinoj*, *ĉevaloj*, *vintroj*, *metroj*, *iroj*, *prenoj*.

Se alia vorto jam montras la multe-nombrecon, oni devas tamen uzi J: *du domoj*, *tri domoj*, *multe da katoj*, *du kilogramoj da legomoj*.

Se oni anstataŭigas O-finaĵon per apostrofo (§10), la unu-nombreco restas: *okul'* = *okulo* (neniam *okuloj*).

### Nenombreblaj O-vortoj

Multaj O-vortoj estas nomoj de neindividuecaj aŭ substancecaj aferoj, kiuj ne povas esti nombrataj. Oni ne parolas pri unu aŭ pluraj, sed pri pli aŭ malpli multe: *akvo*, *lakto*, *rizo*, *metalo*, *sablo*, *muziko*, *veturado*, *atendado*.

Tiaj O-vortoj normale ne ricevas J-finaĵon, ĉar la distingo inter unu-nombro kaj multe-nombro estas fremda al ili. Sed iafoje oni parolas pri diversaj specoj de ia neindividueca afero. Tiam oni povas je bezono uzi J-finaĵon:

- *metalo* → *metaloj* = pluraj specoj de metalo
- *muziko* → *muzikoj* = pluraj specoj de muziko
- *Hejme li regalas sin per dolĉaj bonegaj **vinoj**.* [Rt.31] Temas pri pluraj specoj de dolĉa vino.
- *Krom la eŭklida geometrio oni povas elpensi aliajn **geometriojn** kun aliaj reguloj.* Oni parolas pri diversaj geometri-sistemoj.

Ĉe nenombreblaj aferoj oni povas montri la kvanton per mezurunuoj. Tiaj unuoj estas nombreblaj: *tri litroj da akvo*, *du hektogramoj da metalo*, *unu sitelo da sablo*, *tri horoj da muziko*.

Iuj vortoj por manĝeblaj aferoj, kiuj normale nomas individuaĵon, povas tamen iafoje ricevi substancecan signifon, kiam temas pri kuiraĵo, ekz. *fiŝo*, *kolbaso* k.a. Normale oni parolas pri unu, du aŭ pli da fiŝoj aŭ kolbasoj, sed oni ankaŭ povas diri ekz.: *Tiu manĝaĵo estas farita el **fiŝo/kolbaso***. (Ne gravas, ĉu estas unu aŭ pluraj fiŝoj/kolbasoj.) Sed en tiaj okazoj, kiam preskaŭ certe estas pli ol unu, oni ja uzu J-finaĵon: *Tofuo° estas manĝaĵo farita el **sojfaboj***. (Apenaŭ povus esti nur unu sojfabo.) Pli ofte oni tamen diras: *Tio estas fiŝaĵo/kolbasaĵo. Tofuo° estas sojfabaĵo.* Kiam oni mencias la nombron, oni ĉiuokaze devas uzi J-finaĵon, se estas pli ol unu: *Li manĝis du **fiŝojn**. Ŝi povis manĝi nur du **fabojn**.*

Ĉe O-vortoj kun AĴ-sufikso la nombrebleco ofte ne estas fiksita: §38.2.3.

## Grupaj O-vortoj

Iuj nombreblaj O-vortoj montras grupon. Tia O-vorto montras ion, kio konsistas el individuoj, ekz.: *familio* (pluraj personoj), *arbaro* (pluraj arboj), *klaso* (pluraj samspecaj aferoj), *vico* (pluraj aferoj en ia ordo), kaj multegaj aliaj. Kun J-finaĵo tia vorto montras plurajn apartajn grupojn: *familioj* (pluraj grupoj de personoj), *arbaroj* (pluraj grupoj de arboj) k.t.p.

## Agoj

O-vorto, kiu estas nomo de ago, montras sen J-finaĵo unu okazon de tia ago. Kun J-finaĵo ĝi montras plurajn apartajn okazojn de la ago. Longan agadon aŭ ripetadon de ago oni normale montras per la sufikso AD (§38.2.2). AD + simpla O-finaĵo montras unufojan agadon aŭ ripetadon. AD + OJ estas pluraj apartaj longaj agadoj, aŭ pluraj ripetadoj:

- *krio* = unu laŭta voko
- *krioj* = pluraj laŭtaj vokoj
- *kriado* = longa krio, pluraj krioj farataj dum certa tempo
- *kriadoj* = pluraj longaj krioj, plurfoja kriado

## Atentu pri la signifo

Oni atentu pri la signifo de la Esperantaj vortoj. Jen estas kelkaj ekzemploj de vortoj, kiuj povas esti problemaj por iuj:

- *Li vestis sin per blanka **kalsono** kaj nigra **pantalono**.* Por tiaj vestaĵoj oni uzas en multaj lingvoj multe-nombrajn vortojn, ĉar origine temis pri po du vestaĵoj, po unu por ĉiu kruro.
- *Mi elspezis mian tutan **monon**.* [Rz.60] En kelkaj lingvoj oni uzas multe-nombran vorton por mono, ĉar ĝi konsistas el pluraj moneroj kaj monbiletoj.
- *La asocio ricevis novan **statuton***. La vorto *statuto* estas kelklingve ĉiam multe-nombra, ĉar ĝi konsistas el pluraj paragrafoj.
- *Li malsaniĝis je **variolo***. Malsanoj kiel *variolo*, *varicelo* kaj *morbilo* havas en iuj lingvoj multe-nombrajn nomojn, ĉar ili kaŭzas plurajn pustulojn k.s. sur la haŭto.

- *Per **tondilo** ni tondas.* FE.34 La vorto *tondilo* estas en iuj lingvoj multe-nombra, ĉar ĝi konsistas el du kunmetitaj partoj.
- *Tiu muzikisto ludas **drumon**.* Por la kompleksa instrumento drumo oni uzas en multaj lingvoj multe-nombran vorton, ĉar ĝi konsistas el pluraj tamburoj kaj cimbaloj ludataj de unu sola muzikisto.
- ***Usono** estas grandega lando.* La lando Usono havas en multaj lingvoj multe-nombran nomon, ĉar ĝi estas unuiĝo de pluraj ŝtatoj.
- *Ili loĝas en **Nederlando**.* La lando Nederlando havas en iuj lingvoj multe-nombran nomon, ĉar la nomo origine priskribis grupon da regionoj ("la Malaltaj Landoj"), kiuj estis poste kunigitaj.
- *Tiun semajnon mi ne laboros, ĉar mi havos **feriojn**.* *Ferio* estas en Esperanto unu libera tago. Se estas pli ol unu tago, oni diru *ferioj* aŭ uzu la vorton *feriado*.
- *Ŝi portas novajn **okulvitrojn**.* Por tia ilo oni uzas en multaj lingvoj unu-nombran vorton, ĉar temas pri unu ilo, kiu tamen konsistas el du vitroj.

  **Noto:** Iafoje aperas la ideo, ke *okulvitroj* estu traktata kvazaŭ ĝi estus unu-nombra malgraŭ la J-finaĵo: **Mi havas **unu** okulvitrojn.* *Ŝi portas **malnovan** okulvitrojn.** Tio estas eraro. Ĉiu vorto kun J-finaĵo estas nepre multe-nombra. Oni diru: *Mi havas unu paron da okulvitroj. Ŝi portas malnovajn okulvitrojn. Ŝi portas malnovan paron da okulvitroj.* Iuj volas anstataŭigi *okulvitroj* per nova unu-nombra vorto. Tio estus teorie farebla, sed verŝajne praktike ne sukcesus.

### 8.2.3. Nombro ĉe A-vortoj kaj A-vortecaj vortetoj

A-vorto havu J-finaĵon, se ĝi priskribas ion multe-nombran:

- ***granda** domo* = unu domo, kiu estas granda
- ***grandaj** domoj* = pluraj domoj, kiuj estas grandaj
- ***krajona** noto* = unu noto farita per krajono aŭ krajonoj
- ***krajonaj** notoj* = pluraj notoj faritaj per krajono aŭ krajonoj

Rimarku, ke la vortoj *krajona* kaj *krajonaj* neniel montras, kiom da krajonoj estas. La uzo de J en *krajona noto* kaj *krajonaj notoj* dependas nur de la noto-nombro.

Multe-nombra estas kompreneble ĉiu vorto, kiu havas J-finaĵon, sed ankaŭ personaj pronomoj (§11) povas esti multe-nombraj. La pronomoj *ni* kaj *ili* estas ĉiam multe-nombraj. *Vi* kaj *si* estas jen unu-nombraj, jen multe-nombraj. *Oni* estas normale unu-nombra, sed povas esti multe-nombra. *Mi* estas ĉiam unu-nombra (kaj ankaŭ *ci*). La vorteto *ambaŭ* (§15.5) estas ĉiam multe-nombra:

- *Mi estas **feliĉa**.*
- *Ŝi sentas sin **feliĉa**.*
- *Vi estas **feliĉa(j)**.*
- *Oni estas **feliĉa(j)**.*
- *Ni estas **feliĉaj**.*
- *Ili estas **feliĉaj**.*
- *Ili sentas sin **feliĉaj**.*
- *Ambaŭ estas **feliĉaj**.*

A-vorto, kiu priskribas subkomprenatan O-vorton, havu J-finaĵon, se tiu O-vorto havus J-finaĵon:

- *Estis partoprenantoj el la tuta mondo. La **aziaj** estis plej **multaj**. = La aziaj partoprenantoj estis plej multaj.*

Kiam A-vorto priskribas nombran vorteton (sen posta O-vorto), oni uzu J-finaĵon, se estas pli ol unu:

- *Alvenis tri knabinoj. Unu el ili estis **konata** al mi, sed du estis **nekonataj**.* Oni povus diri, ke la vortoj *knabino* kaj *knabinoj* estas subkomprenataj post la nombraj vortetoj *unu* kaj *du*.

Nombraj vortetoj iafoje montras abstraktan nombron, kaj nenia O-vorto estas subkomprenata. Tiam oni normale uzas E-vorton kiel priskribon. E-vortoj neniam povas havi J-finaĵon: *Mil estas **multe**. Du **multiplikite** per du estas kvar.* Se oni uzas A-vorton en tia frazo, oni komprenus, ke ia O-vorto estas subkomprenata: *Dek estas **difektitaj**. = Dek aŭtoj/maŝinoj/seĝoj ... estas difektitaj.*

Kiam A-vorto priskribas plurajn O-vortojn, ĝi havu J-finaĵon, ĉar la signifo estas multe-nombra:

- *La tablo kaj la seĝo estas **eluzitaj**.* Unu tablo kaj unu seĝo estas du aferoj. Ambaŭ estas eluzitaj.
- *En la ĉambro estis **verdaj** seĝo kaj tablo.* Tie estis (unu) verda seĝo kaj (unu) verda tablo.
- *Li kaj lia amiko estas same **kulpaj**.* Ambaŭ estas kulpaj.
- *Nek li, nek lia amiko estas **ĝojaj** pro la severa puno.* Ambaŭ malĝojas.
- *Ŝia blanka kolo kaj ŝia brusto estis **kovritaj** per granda ĉenaĵo de malnovaj kaj novaj moneroj.* [FA1.234] Unu kolo kaj unu brusto estas du.

## J nur se fakte temas pri pluraj aferoj

Iafoje A-vorto rilatas al O-vorto kun J-finaĵo, sed priskribas laŭsence nur unu el la pluraj aferoj. Tiam la A-vorto ne havu J-finaĵon:

- *Tie staris pluraj grandaj kaj unu **malgranda** tabloj.* Kvankam *malgranda* rilatas al la vorto *tabloj*, ĝi estu sen J, ĉar ĝi priskribas nur unu el la tabloj.
- *Mi volas **verdan** kaj **ruĝan** krajonojn. = ... unu verdan krajonon kaj unu ruĝan krajonon.*
- *Ĉiuj damoj, la **karoa**, **kera**, **trefa** kaj **pika**, sidis en la unua vico.* [FA2.106] Estis nur po unu damo el ĉiu speco. Efektive la A-vortoj priskribas la unu-nombran vorton *damo*, kiu estas subkomprenata post ĉiu el ili: *... la **karoa** damo, **kera** damo, **trefa** damo kaj **pika** damo ...*
- *Venis **franca** kaj **germanaj** gastoj. = Venis unu franca kaj pluraj germanaj gastoj.*
- *Du partoprenantoj estis respektive **japana** kaj **korea**.* Estis unu japana partoprenanto kaj unu korea partoprenanto.

Por tiaj ĉi komplikitaj signifoj oni elektu facile kompreneblan esprimo-manieron. La ĉi-antaŭaj frazoj estas ĉiuj gramatike ĝustaj, sed iuj el ili povus esti pli klaraj. Ekz. anstataŭ *franca kaj germanaj gastoj* estas pli klare diri *unu franca kaj pluraj germanaj gastoj*.

## Evito de miksitaj formoj

Multe-nombra A-vorto kune kun pluraj unu-nombraj O-vortoj povas iafoje ŝajni kiel stranga miksaĵo, kvankam tio estas tute logika. Zamenhof ofte evitis tian mikson, uzante unu-nombran A-vorton, precipe kiam la A-vorto estis poseda pronomo, aŭ kiam temis pri pluraj abstraktaj O-vortoj:

- ***mia** frato kaj fratino* [FE.36] = *miaj frato kaj fratino*. Oni povus diri, ke *mia* estas subkomprenata antaŭ *fratino*: *mia frato kaj mia fratino*.
- *La pli maljuna estis tiel simila al la patrino per **sia** karaktero kaj vizaĝo.* [FE.11] *Sia* estas priskribo kaj de *karaktero*, kaj de *vizaĝo*. Oni povus diri, ke *sia* estas subkomprenata antaŭ *vizaĝo*.
- *la **simpla** lernado kaj uzado de Esperanto* [OV.378] *Simpla* estas subkomprenata antaŭ *uzado*. Alternative oni povas diri, ke *lernado kaj uzado* kune estas unu ideo.
- *Oni povas proponi* [...] *ekzemple **internacian** monsistemon, horsistemon, kalendaron k.t.p.* [OV.379] *Internacian* estas subkomprenata antaŭ *horsistemon* kaj *kalendaron*.

Same Zamenhof ofte evitis uzi plurajn unu-nombrajn A-vortojn kune kun unu multe-nombra O-vorto:

- *Estis inter la **sepa** kaj **oka** <u>horo</u> vespere.* [M.200] *= ... la sepa kaj (la) oka **horoj** ...*

## Atentu al kio rilatas A-vorto

Iafoje oni riskas erare rilatigi A-vorton al ia vorto, kiu staras pli proksime ol tiu, kiun la A-vorto vere priskribas:

- *<u>Iu</u> el tiuj malŝatindaj friponoj certe estas **kulpa**.* Ne **kulpaj**, ĉar *kulpa* estas priskribo de *iu*, ne de *friponoj*.
- *<u>Unu</u> el miaj plej bonaj amikoj estis **elektita** en la Akademion. Elektita* priskribas la vorton *unu*, ne la vorton *amikoj*.
- *<u>Iuj</u> en tiu granda nedistingebla homamaso estis **alvenontaj** al la sama celo kiel ni. Alvenontaj* priskribas la subjekton *iuj*, ne la vorton *homamaso*.

## *Speco de*

Ĉe esprimoj kun *speco de* povas iafoje ekesti hezito inter unu-nombro kaj multe-nombro:

- *Tiaj specoj de vino estas tre **multekostaj**. Multekostaj* gramatike priskribas la vorton *specoj*, kvankam ĝi sence rilatas ankaŭ al *vino*.

### A-vortecaj vortetoj

Vortetoj, kiuj povas roli A-vortece (§15), kaj kiuj povas ricevi J-finaĵon, sekvas la samajn regulojn pri J-finaĵo kiel A-vortoj.

- ***tiu** domo → **tiuj** domoj*
- ***tia** domo → **tiaj** domoj*
- ***tiuj** kato kaj hundo = **tiu** kato kaj **tiu** hundo*
- ***tiuj** kato kaj hundoj = **tiu** kato kaj **tiuj** hundoj*
- *Jen la kato kaj la hundo, **kiu** apartenas al mi.* Nur la hundo apartenas al mi.
- *Jen la kato kaj la hundo, **kiuj** apartenas al mi.* Kaj la kato, kaj la hundo apartenas al mi.
- *Jen la kato kaj la hundoj, **kiuj** apartenas al mi.* La frazo estas dusenca. Verŝajne nur la hundoj apartenas al mi, sed povas esti, ke ankaŭ la kato estas mia.
- *Jen la hundoj kaj la kato, **kiuj** apartenas al mi.* Kaj la hundoj kaj la kato apartenas al mi.

### 8.2.4. Nombro — specialaj okazoj

La kunliga vorteto *aŭ* (§16.2) normale montras ekskluzivan sencon (devas esti nur unu el la alternativoj), sed iafoje ĝi estas inkluziva (povas validi pluraj alternativoj samtempe). Kiam pluraj aferoj estas ligitaj per *aŭ*, la uzo de J-finaĵo dependas de la senco:

- *Karlo aŭ Petro estas **kulpa**.* Nur unu estas kulpa.
- *Aŭ la angloj aŭ la francoj estos **unuaj** sur la scenejo.* Nur unu el la alternativoj povas validi, sed ĉiu el ili estas per si mem multe-nombra.
- *Aŭ mi aŭ miaj kontraŭuloj estas **prava(j)**.* Ĉi tie nek gramatika logiko, nek la senco povas solvi la konflikton inter unu-nombro kaj multe-nombro. Oni elektu laŭplaĉe. Verŝajne plej multaj elektus *pravaj* pro la proksimeco al la vorto *kontraŭuloj*. Plej bone estas verŝajne revortigi la frazon por eviti la problemon: *Aŭ mi estas **prava**, aŭ miaj kontraŭuloj (estas **pravaj**).* En tiu ĉi okazo la plej simpla solvo estas: *Aŭ mi aŭ miaj kontraŭuloj **pravas**.*

Iafoje oni povas aŭ rigardi ĉiujn membrojn de grupo kune, aŭ rigardi ĉiun individuon aparte:

- *Unu velo post la alia estis **levataj**.* [FA1.88] Zamenhof pensis pri ĉiuj veloj kune, sed se oni pensas pri ĉiu aparta levo de velo, oni povas forlasi la finaĵon J, sed tiam oni ankaŭ ŝanĝu *levataj* al *levita* (§29.2.2).

Iafoje du (aŭ pluraj) unu-nombraj esprimoj montras la saman aferon. Malgraŭ ŝajna plureco, temas pri nur unu:

- *Gaston Waringhien, ĉefaŭtoro de Plena Ilustrita Vortaro, kaj kunaŭtoro de Plena Analiza Gramatiko, estas prave **rigardata** kiel unu el la majstroj de Esperanto.* Supraĵe povas ŝajni kiel tri homoj, sed estas vere

nur unu, kiun oni nomas en tri manieroj. Sekve estu *rigardata* (ne *rigardataj*).

- *Tiu ĉi strando, aŭ plaĝo, estas* ***perfekta*** *por niaj bezonoj.* La aldono *aŭ plaĝo* ne priparolas alian lokon, sed la saman per preskaŭ samsignifa vorto.

Iafoje apud unu ĉefa afero aperas alia en flanka komparo, necerteca aldono, aŭ simile. Tiam oni konsideru normale nur la ĉefan esprimon. Pri tiaj frazoj tamen ne ekzistas firmaj reguloj, ĉio dependas de la senco:

- *La instruistino, same kiel ŝiaj lernantoj, estis post kvartaga intensa instruado tre* ***laca****. Laca* estu normale unu-nombra, ĉar ĝi priskribas ĉefe la instruiston, sed ne estus eraro diri *lacaj*, se oni volas klare inkluzivigi ankaŭ la lernantojn.
- *Elizabeto, kaj eble ankaŭ ŝia edzo, estos verŝajne* ***invitita(j)***. Oni diru *invitita* aŭ *invititaj* depende de la verŝajneco, ke ankaŭ la edzo estos invitita.
- *Sofio, sed ne ŝia fratino, estas* ***bonvena*** *al la festo.* Ĉi tie *bonvena* laŭsence ne priskribas la fratinon, kaj estus do erare diri *bonvenaj*.

## Speco

Kiam oni parolas ĝenerale pri ia speco (§9.1.4), la distingo inter unu-nombro kaj multe-nombro ofte fariĝas malgrava:

- ***Infano*** *ne estas matura homo.* [FE.6] = ***Infanoj*** *ne estas maturaj homoj.*
- *En* ***domo*** *kaj* ***milit'*** *la* ***viro*** *regas.* [IT.6] = *En* ***domoj*** *kaj* ***militoj*** *la* ***viroj*** *regas.*

## Grupo kun po unu

Kiam oni parolas pri du grupoj, kaj ĉiu el la unua grupo rilatas al **po unu** el la dua grupo, estas plej bone uzi multe-nombron por la unua grupo, kaj unu-nombron por la dua. Ofte tiaj frazoj estas teorie dusencaj, sed plej ofte tamen praktike unu-sencaj:

- *En tiu kvartalo troviĝas domoj kun* ***bela pordo***. La domoj estas pluraj, tial oni diras *domoj* en multe-nombro. Ankaŭ la belaj pordoj estas pluraj, sed ĉiu domo havas nur po unu (ĉefan) pordon, kaj tial oni diras *bela pordo* en unu-nombro. Teorie la frazo povas ankaŭ signifi, ke ĉiuj domoj havas nur unu komunan pordon (malverŝajne). Se oni dirus *belaj pordoj*, la frazo estus normale komprenata tiel, ke ĉiu domo havas plurajn belajn pordojn. Por ekstrema klareco oni povas diri ekz. *... domoj, el kiuj ĉiu havas belan pordon* aŭ *... domoj kun po unu bela pordo*.
- *La nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi eĉ antaŭ* ***nia nazo***. [FE.33] Kvankam estis pluraj nazoj, oni uzas *nia nazo* en unu-nombro, ĉar ĉiu el ni havis po unu nazon. Teorie la frazo povas ankaŭ signifi, ke ni havis nur unu komunan nazon (absurde). Se oni dirus *niaj nazoj*, la frazo estus normale komprenata tiel, ke ĉiu el ni havis plurajn nazojn, kvankam tio estas absurda. Por ekstrema klareco oni povus diri ekz. *... ke neniu el ni ion povis vidi eĉ antaŭ sia nazo.*

- *Tiuj, kiuj voĉdonas por la propono, levu la* ***dekstran manon***. Kvankam temas (verŝajne) pri pluraj dekstraj manoj, oni uzas unu-nombron, ĉar ĉiu levu nur po unu dekstran manon, la propran.

### Pli ol unu, malpli ol du

Post la esprimo *pli ol unu* oni povus teorie uzi multe-nombron, sed oni uzas ĉiam unu-nombron pro la ĉeesto de *unu*. Ankaŭ post *malpli ol unu* oni uzas unu-nombron:

- *Mi perlaboras nur iom* ***pli ol unu dolaron*** *en tago.* [FK.104]
- *Mi povas nutri* ***pli ol unu familion****!* [FA2.137]
- ***Malpli ol unu tagon*** *Antono uzis, por veni returne al Eisenach.* [FA3.144]

  **Noto:** Zamenhof uzis ankaŭ *pli-ol-unu* (kun dividostrekoj) = *pluraj*. Tiam li uzis multe-nombron poste. Nuntempe oni neniam uzas *pli-ol-unu* tiumaniere, sed nur la vorton *pluraj*, kiu ne estas zamenhofa (ĝi aperis nur en 1904). Zamenhof uzis ankaŭ *kelkaj* kaj *kelke* + *da*-esprimo por "pluraj", sed tian signifon *kelkaj* kaj *kelke* ne plu havas (kvankam kompreneble en la praktiko la diferenco inter "kelkaj" kaj "pluraj" estas tre subjektiva afero).

Post *malpli ol du* oni povus teorie uzi unu-nombron, sed pro la ĉeesto de *du* oni uzas ĉiam multe-nombron: *En* ***malpli ol du horoj*** *mi revenos.*

### *Nul* kaj malpli

Kiam *nul* (§23.1.1) estas uzata kiel nombra priskribo (§23.1.2), oni povas heziti, ĉu uzi unu-nombron aŭ multe-nombron, ĉar *nul* estas nek unu, nek pluraj. Oficiala regulo ne ekzistas. Oni povas rezoni en du manieroj:

- Aŭ oni uzas J nur por nombroj super unu, do ne por ekz. nul aŭ 0,5.
- Aŭ oni uzas J por ĉiuj (pozitivaj) nombroj krom ekzakte unu, do ankaŭ por nul kaj por nombroj inter nul kaj unu, ekz. 0,5.

Ambaŭ aliroj estas egale logikaj:

- *Post tio restos* ***nul homo(j)***. Ĉi tia uzado de *nul* aperas preskaŭ nur en poezio k.s. Normale oni dirus *neniu homo* (aŭ *neniuj homoj*).
- *Mi aĉetis* ***nul komo kvin kilogramo(j)n*** *da rizo.*

Negativajn nombrojn oni traktas same kiel la respondajn pozitivajn nombrojn:

- *En Laponujo* ***-40 (minus kvardek) celsiaj gradoj*** *ne estas nekutima temperaturo.*
- *La akvo estas malvarma je* ***minus nul komo du grado(j)***.
- *Restas al li* ***minus unu eŭro***. *Tio signifas, ke li ŝuldas unu eŭron.*

### Neniu, neniuj, ĉiu, ĉiuj

Kaj *neniu* kaj *neniuj* (§15.1) principe egalas al nul, sed *neniu* estas gramatike unu-nombra, dum *neniuj* estas multe-nombra:

- ***Neniu*** *homo estas* ***perfekta***.
- ***Neniuj*** *homoj estas* ***perfektaj***.

Kaj *ĉiu* kaj *ĉiuj* (§15.1) principe estas laŭsence iel multe-nombraj, sed *ĉiu* estas gramatike unu-nombra, dum *ĉiuj* estas multe-nombra:

- ***Ĉiu*** *homo estas* ***mortema****.*
- ***Ĉiuj*** *homoj estas* ***mortemaj****.*

## Onoj

Ĉe ON (§38.2.27)-vortoj oni uzas unu-nombron, kiam temas pri unu ono, kaj multe-nombron, kiam estas pli ol unu ono:

- *Nu, kio estos, se almenaŭ* ***unu duono*** *de tio, kion li parolis, estas vero?* [Rz.50]
- ***Du duonoj*** *faras unu tuton!* [FA3.73]
- *Li trinkis* ***duonan litron*** *da lakto. = ... unu duonan litron ..., ... unu duonon de litro ...*
- *Ni disiĝas kiel* ***duonaj parencoj****.* [BV.29] La A-vorto *duonaj* havas J-finaĵon, ĉar ĝia ĉefvorto, *parencoj*, havas J-finaĵon.

# 9. Difiniloj

Difiniloj estas specialaj vortoj, kiujn oni metas antaŭ O-vorta frazparto por difini la identecon de la afero:

- La plej grava difinilo estas la difina artikolo *la* (§9.1).
- Aliaj difiniloj estas tabelvortoj je U, A kaj ES, posedaj pronomoj, *ambaŭ*, kaj *unu* (§9.2).
- Iafoje oni uzas pli ol unu difinilon (§9.3).

## 9.1. Difina artikolo — *la*

### 9.1.1. *La* — bazaj reguloj

La vorteton *la* oni nomas **difina artikolo**. Ĝi montras, ke oni parolas pri **certa afero konata de la alparolato**. Tia konateco (§9.1.3) povas tamen esti tre diversspeca.

Oni ne aldonas finaĵojn al *la*. Ĝia formo ne varias, ĉu la frazparto estas unu-nombra, ĉu multe-nombra, ĉu la frazparto havas N-finaĵon, ĉu mankas N-finaĵo:

- *la domo = tiu de vi konata domo*
- *la bela junulino = tiu de vi konata bela junulino*
- *la domo kun bela pordo = tiu de vi konata domo kun bela pordo*
- *la junulinoj = tiuj de vi konataj junulinoj*
- *la altaj montoj = tiuj de vi konataj altaj montoj*
- *la domoj kun bela pordo = tiuj de vi konataj domoj kun bela pordo*
- *la ruĝajn krajonojn = tiujn de vi konatajn ruĝajn krajonojn*

Oni povas en iaj okazoj uzi la mallongigitan apostrofan formon *l’* (§10.1).

*La* staras antaŭ aliaj priskriboj de la O-vorto. Eventualan rolvorteton oni metas antaŭ *la*:

- *en **la** domo*
- *ĉe **la** bela junulino*
- *pri **la** altaj domoj*
- *super **la** domoj kun belaj fenestroj*

Ne diru do **en tuta la mondo**, sed *en la tuta mondo*. Ne diru: **Li ronkis tutan la nokton.** Sed: *Li ronkis la tutan nokton.*

Tamen en iuj specialaj nomesprimoj, precipe de reĝoj kaj aliaj altranguloj, oni tradicie metas *la* post la O-vorto antaŭ A-vorta priskribo:

- *Karolo **la** Kvina*
- *Luizo **la** Dek-kvara*
- *Vilhelmo **la** Silentema*
- *Timuro **la** Lama*

Oni povas diri, ke en tiaj okazoj temas pri du frazpartoj. La unua estas la propra nomo, kaj la dua estas mallongigita apudmeto (§25.3): *Karolo, la kvina reĝo kun tiu nomo* / *Luizo, la dek-kvara reĝo kun tiu nomo* / *Vilhelmo, la silentema reĝo* / *Timuro, la lama sultano*.

En poezio oni ofte uzas *la* en nenormalaj manieroj. Oni ekz. metas A-vortojn antaŭ *la* (§10.1), aŭ uzas *la* kune kun poseda pronomo (§9.2). Tia nenormala uzo povas iafoje esti arta, sed oni ne tro malproksimiĝu de la ordinaraj reguloj.

En la *Fundamenta Gramatiko* estas skribite, ke personoj, por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵon, povas tute ĝin ne uzi. Tiu permeso validas nur por komencantoj.

### Malpermesoj de *la*

En kelkaj okazoj simplaj reguloj malpermesas *la*:

- Ne uzu *la* ĉe frazparto, kiu havas **alian difinilon** (§9.2). Aliaj difiniloj estas la **posedaj pronomoj** (kiam ili estas uzataj kune kun O-vorto), la **tabelvortoj je U, A** kaj **ES**, la vorteto ***ambaŭ***, kaj **duondifina *unu***:
  - ***Mia** dorso doloras.* Ne: **__La mia__ dorso doloras.**
  - ***Tiu** domo estas granda.* Ne: **__La tiu__ domo estas granda.**
  - ***Ĉiuj** gastoj jam venis.* Ne: **__Ĉiuj la__ gastoj jam venis.**
  - *Mi ŝatas **ĉiajn** legomojn.* Ne: **Mi ŝatas __la ĉiajn__ legomojn.**
  - ***Kies** gasto mi estas, **ties** feston mi festas.* Ne: **__La kies__ gasto ... __la ties__ festo ...**
  - *Mi legis **ambaŭ** librojn.* Ne: **Mi legis __la ambaŭ__ librojn.**
- Ne uzu *la* ĉe vorto, kiu per si mem estas propra nomo:
  - *Pasintjare mi vojaĝis al **Kanado**.* Ne diru: **... al __la Kanado__.**
  - *Kie estas **Francisko**?* Ne diru: **Kie estas __la Francisko__?**

  Sed ĉe ordinaraj vortoj, kiuj fariĝis propraj nomoj, oni normale ja uzas *la* (§9.1.6).
- Ne uzu *la* ĉe la frazrolo **alvoko** (§12.1.2):
  - ***Kelnero**, alportu al mi glason da biero!* Ne diru: **__La kelnero__, ...**

### Individuaĵo aŭ speco

La uzo de *la* tre dependas de tio, ĉu oni parolas pri certa individuaĵo (§9.1.2), aŭ oni parolas ĝenerale pri speco (§9.1.4).

## 9.1.2. *La* — individuaĵoj

Kiam temas pri individuaĵoj (ne pri speco), *la* signifas, ke la parolanto supozas, ke la alparolato konas la aferon. *La* tiam signifas pli-malpli "vi scias, pri kiu(j) mi parolas".

Foresto de *la* (aŭ alia difinilo) signifas, ke la parolanto supozas, ke la alparolato ne konas la aferon. Manko de difinilo signifas pli-malpli "vi ne

scias, pri kiu(j) mi parolas". Manko de difinilo povas ankaŭ signifi, ke la identeco ne gravas.

Neuzo de *la* estas do same grava kiel uzo de *la*.

### Ekzemploj

- ***La rozo** apartenas al Teodoro.* [FE.5] La parolanto supozas, ke la aŭskultanto povas kompreni, pri kiu rozo temas.
- *Al Teodoro apartenas **rozo**.* Nun temas pri rozo, kiun la aŭskultanto ne konas.
- *La infanoj kolektis **florojn**.* La aŭskultanto ne scias, pri kiuj individuaj floroj temas.
- *La infanoj kolektis **la florojn**.* Ili kolektis tiujn florojn, kiujn la aŭskultanto konas.
- ***Infano** ploras.* Iu nekonata infano ploras.
- ***La infano** jam ne ploras.* [FE.6] La parolanto supozas, ke la aŭskultanto komprenos, kiu infano estas. *La infano* estas kvazaŭ okaza propra nomo de certa konata infano.
- *Donu al **la birdoj** akvon, ĉar ili volas trinki.* [FE.9] Oni parolas pri konata grupo de birdoj.
- ***Domo** brulas!* Individua domo brulas, sed la parolanto ne estas certa, ĉu la aŭskultanto scias, pri kiu domo temas.
- ***La domo** brulas!* La parolanto volas informi, ke nun brulas tiu certa domo, kiun la aŭskultanto supozeble konas (eble lia hejmo).
- *Dum **la du fojoj**, ke vi vizitis min, mi estis tre feliĉa.* La parolanto uzas la frazparton *la du fojoj* por identigi du fojojn, kiujn la aŭskultanto konas. (Legu ankaŭ pri la uzo de *ke* post *fojo* en §33.2.4.)
- ***La multaj gastoj** restis ĝis noktomezo.* La parolanto ne volas informi, ke la gastoj estis multaj, sed parolas pri ili per la okaza nomo *la multaj gastoj* supozante, ke la aŭskultanto jam aŭdis pri ili.
- *Vi diris tion jam **du fojojn**.* Ĉi tie la identeco de la fojoj ne gravas. Oni ne volas identigi la fojojn, sed nur nombri ilin. La frazo povas respondi al la demando: *Kiel ofte (kiom da fojoj) mi diris tion?*
- *Venis **multaj gastoj** al via festo, ĉu ne?* La gastoj ja estis certaj individuoj, sed ĉi tie la frazparto *multaj gastoj* nur servas por informi pri la kvanto de gastoj. Iliaj identecoj ne gravas.

### 9.1.3. *La* — konateco

Konateco povas ekesti en diversaj manieroj.

#### Antaŭe menciita

Normale io estas konata, ĉar oni jam antaŭe menciis ĝin. *La* tiam signifas, ke oni denove mencias ion jam antaŭe priparolitan. Neuzado de *la* signifas, ke oni enkondukas en la rakonton nova(j)n persono(j)n aŭ afero(j)n:

- *Mi havas* ***grandan domon****.* ***La domo*** *havas du etaĝojn.* Ĉe la unua mencio la aŭskultanto ankoraŭ ne scias, pri kiu domo temas. Tial la parolanto ne uzas *la*. Ĉe la dua mencio la parolanto aldonas *la* por montri, ke temas pri la ĵus menciita domo. Se li tiam ne uzus *la*, la aŭskultanto devus supozi, ke temas pri alia domo ol la ĵus menciita.
- *En tiu ĉi skatolo estas* ***frukto****.* ***La frukto*** *estas ronda.* Unue *frukto* (sen *la*) enkondukas novan aferon. La aŭskultanto do scias, ke ekzistas frukto en la skatolo. Poste la parolanto povas daŭrigi paroli pri tiu sama frukto per la vortoj *la frukto*.
- *Mi havas* ***tri infanojn****.* ***La infanoj*** *ofte ĝojigas min. La* montras, ke temas denove pri la jam menciitaj infanoj.
- *Sur la strato iris* ***tri viroj****. Ili aspektis kiel* ***friponoj****. Subite* ***la tri friponoj*** *malaperis en* ***bankon****. Ŝajnis, ke* ***la banko*** *estas prirabota.* Post la unua mencio de la tri viroj, kaj la informo, ke ili aspektas kiel friponoj, oni povas simple nomi ilin *la (tri) friponoj*. La frazparto *la (tri) friponoj* servas kiel okaza propra nomo de ĝuste tiuj tri viroj. Post la unua mencio de la banko oni povas nomi ĝin *la banko*.

Ne estas necese uzi precize la samajn vortojn por povi paroli pri la sama afero kun *la*:

- *Tre malproksime de ĉi tie* [...] *loĝis reĝo, kiu havis* ***dek unu filojn*** *kaj unu filinon, Elizon.* ***La dek unu fratoj*** [...] *iradis en la lernejon kun stelo sur la brusto kaj sabro ĉe la flanko.* [FA1.159] Kvankam oni unue mencias ilin per la vorto *filoj*, oni povas poste nomi ilin *la (dek unu) fratoj*. Oni senprobleme komprenas, ke estas la samaj homoj.

#### Nerekte menciita, divenebla

Ofte io estas konata, ĉar alia antaŭe menciita afero komprenigas ĝian ekziston, aŭ ĉar la aŭskultanto havas la necesajn sciojn pri la mondo. Ofte oni antaŭsupozas tre detalajn sciojn:

- *Mi aĉetis aŭton, sed* ***la motoro*** *ne funkcias.* La motoro mem ne estas rekte menciita antaŭe, nur la aŭto, sed ĉar ĉiu aŭto normale havas motoron, la aŭskultanto povas kompreni, ke temas pri la motoro de la ĵus menciita aŭto. Oni povus ankaŭ diri *ĝia motoro*, kio estus eĉ pli klara.
- *Tie vi rimarkos tri pordojn. Vi povas ilin malfermi,* ***la ŝlosilo*** *sidas en ili.* [FA1.5] Unue la tri pordoj estas menciitaj. Pordo normale havas seruron, kaj por seruro normale ekzistas ŝlosilo. Oni do komprenas, ke *la ŝlosilo* estas la speciala ŝlosilo de ĉiu el la jam menciitaj pordoj.

- *Mi manĝas per **la buŝo** kaj flaras per **la nazo**.* [FE.8] La aŭskultanto scias, ke la parolanto estas homo, kaj ke homo havas buŝon kaj nazon. *La buŝo* kaj *la nazo* do egalas al *mia buŝo* kaj *mia nazo*. Oni povus eble forlasi *la*, sed tiam iomete sonus kvazaŭ la parolanto dubus, ke la aŭskultanto scias, ke homo havas buŝon kaj nazon.
- *Ĉiuj sonoriloj de **la preĝeja turo** sonorvokis en **la preĝejon, la homoj** estis orname vestitaj kaj iris kun **la kantolibro** sub la brako, por aŭskulti **la predikon**.* [FA1.13] Antaŭe oni nur informis, ke la aferoj okazas en vilaĝo dimanĉe (temas cetere pri fabela vilaĝo, kiun la leganto do ne povas koni). Oni ne parolis antaŭe pri preĝejo, preĝeja turo, homoj, kantolibroj aŭ prediko. La rakontanto tamen supozas, ke la leganto scias, ke en vilaĝoj troviĝas homoj kaj preĝejo kun turo, kaj ke en dimanĉo la homoj iras al la preĝejo, kie okazas prediko, kaj ke la homoj posedas kantolibrojn. La uzo de *la*-oj do diras al la leganto kvazaŭ: "Vi ja scias, ke tiaj aferoj kutime okazas en vilaĝoj dimanĉe." Se oni rakontus tion ĉi al homo, kiu eble ne scias ĉion tion, oni ne uzus *la*.

### Plene priskribita

Frazparto povas havi priskribojn, kiuj komprenigas, pri kiu temas:

- *Jen kuŝas **la ĉapelo de la patro**.* [FE.8] La priskribo *de la patro* klarigas, pri kiu ĉapelo temas. Oni subkomprenas, ke ekzistas nur unu ĉapelo de la patro. Se oni ne uzus *la*, oni do devus supozi, ke ĝi estas nur unu el pluraj ĉapeloj de la patro. Povas ankaŭ esti, ke la aŭskultanto scias, ke unu el pluraj ĉapeloj apartenas al la patro (dum la aliaj apartenas al aliaj personoj), kaj ke nun la parolanto montras ĝuste tiun ĉapelon.
- *Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis **la tagon, en kiu li estis naskita**.* [FE.33] La subfrazo *en kiu li estis naskita* plene klarigas, pri kiu tago temas. Ja ne povas ekzisti pli ol unu tia tago.
- *Por **la hodiaŭa tago** mi ricevis duoblan pagon.* [FE.14] La vorto *hodiaŭa* plene klarigas, pri kiu tago temas.
- ***La kanto de la birdoj** estas agrabla.* [FE.9] La priskribo *de la birdoj* klarigas, pri kiu kanto temas. *La birdoj* havas *la*, ĉar ili estas alimaniere konataj, eble ĉar la aŭskultanto povas mem aŭdi ilin.
- *Mi redonas al vi **la monon, kiun vi pruntis al mi**.* [FE.14] La subfrazo *kiun vi pruntis al mi* plene klarigas, pri kiu mono temas. Tamen povus esti, ke antaŭe okazis pluraj pruntoj. Tiam oni normale ne uzus *la*, ĉar tiam la priskribo ne sufiĉus por identigi la prunton. Povus ankaŭ esti tiel, ke la aŭskultanto jam forgesis pri la prunto. Se la parolanto scius tion, li ne uzus *la*.
- *Tio ĉi estis **la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin sia filino**.* [FE.17] La priskriboj *unua* kaj *ke ŝi nomis ŝin sia filino* plene klarigas, pri kiu fojo temas. Sen *la* ŝajnus, ke ekzistus pluraj unuaj fojoj de tio, kvankam tio estus absurda.

### Nomata

Se post O-vorto aperas propra nomo kiel identiga priskribo (§25.2), oni ordinare aldonas *la* antaŭ la O-vorto, ĉar propra nomo normale sufiĉas por plene identigi ion:

- *Mi vojaĝis al* ***la urbo Parizo***. La nomo *Parizo* plene identigas la urbon.
- ***La sufikso "um"*** *ne havas difinitan signifon.* [FE.42] Per *"um"* oni rekte informas, pri kiu sufikso temas. La sufikso kvazaŭ nomiĝas "um".

Legu pli detale pri *la* kaj propraj nomoj kiel priskriboj en §9.1.6.

### Rekte vidata

Afero povas esti konata pro tio, ke la aŭskultanto rekte vidas ĝin, aŭ alimaniere rimarkas ĝin:

- ***La domo*** *estas vere bela.* Tiel oni povas diri, kiam la interparolantoj ambaŭ vidas la domon.
- ***La floroj*** *odoras tre bone.* Tio estas ebla, kiam la aŭskultanto mem vidas aŭ flaras la florojn, kaj do facile komprenas, pri kiuj floroj temas.
- *Atentu pri* ***la ŝtono****!* La alparolato mem povas vidi la ŝtonon, aŭ la parolanto almenaŭ supozas, ke la aŭskultanto pro la averto rigardos kaj ekvidos la ŝtonon.
- *"Ĉu vi vidas tie* ***la grandan arbon****?" diris la sorĉistino, montrante* ***arbon****, kiu troviĝis apud ili.* [FA1.5] Temas ambaŭfoje pri la sama arbo. Unue parolas la sorĉistino. La persono, al kiu ŝi parolas, povas mem vidi la arbon (ŝi ja eĉ fingromontras ĝin). Tial la sorĉistino uzas *la*. Poste parolas la verkinto de la fabelo, sed li ne uzas *la*, ĉar la leganto ne povas vidi la arbon.

### Ĝenerale konata, unika

Afero povas esti konata, ĉar ĝi estas tute unika, ĉar ekzistas nur unu tia afero, aŭ ĉar ĝi estas tiel elstara aŭ speciala, ke povas temi nur pri ĝi:

- ***La ĉielo*** *estas blua.* [FE.6] Ĉiuj scias, ke ekzistas ĉielo. Oni povas do nomi ĝin simple *la ĉielo*.
- ***La suno*** *brilas.* [FE.5] Ja ekzistas multaj sunoj, sed kompreneble temas pri la suno de nia planedo. Ofte oni eĉ uzas *la Suno* (kun majusklo) kiel propran nomon (§9.1.6) de nia suno.
- ***La filo de la reĝo*** [...] *ŝin renkontis.* [FE.21] La parolanto supozas, ke la aŭskultanto scias, ke ekzistas reĝo en la priparolata lando. Pro la uzo de *la* la aŭskultanto komprenas, ke temas pri ĝuste tiu reĝo. La aŭskultanto eble ne scias, kiom da filoj havas la reĝo, sed ĉar la parolanto diris *la filo* la aŭskultanto povas kompreni, ke li havas nur unu filon (aŭ eble nur unu atentindan filon), kaj ke ĝuste tiu filo ŝin renkontis.
- ***La prezidanto de Usono*** *diris, ke ...* La parolanto supozas, ke la aŭskultanto scias, ke Usono havas ŝtatprezidanton, kaj nur unu. Pro tio oni povas nomi lin simple *la prezidanto de Usono*. Se oni dirus *prezidanto de Usono* sen *la*, tiam la aŭskultanto komprenus, ke temas pri iu el la

antaŭaj prezidantoj de Usono, sed certe ne la nuna (ĉar, se estus la nuna, oni nepre uzus *la*).

- ***La eŭropanoj** ekkonis Amerikon en **la dek-kvina jarcento**.* Supozeble ĉiuj scias, ke ekzistas eŭropanoj. Supozeble ĉiuj ankaŭ scias, ke ekzistis dek-kvina jarcento. Se tamen hazarde la aŭskultanto ne konus la eŭropanojn, li tamen pro la uzo de *la* informiĝas, ke ekzistas nur unu tia grupo, kaj temas pri (pli-malpli) ĉiuj el ili.

### 9.1.4. *La* — specoj

Ofte O-vorto estas uzata por paroli pri speco, por diri **kia** io estas. Oni povas tion fari en diversaj manieroj: sen *la*, kun *la*, unu-nombre aŭ multe-nombre. Ofte oni povas uzi ĉiun ajn manieron laŭplaĉe aŭ laŭ la stilo.

#### Speco kvazaŭ nekonata individuo

Plej ofte oni ne uzas difinilon, kiam oni parolas pri speco. Oni kvazaŭ rigardas la specon kiel unu nekonatan individuon, aŭ kiel individuon, kies identeco ne gravas. Oni prezentas specojn sen difinilo, kiam la diraĵo validas, ĉu pri ĉiuj de la speco, ĉu pri unuopa membro de la speco:

- ***Leono** estas **besto**.* [FE.5] Oni volas diri, ke leono estas unu el la multaj bestospecoj, ne plantospeco aŭ alia afero. La ideo validas, ĉu oni pensas pri ĉiuj leonoj kune, ĉu oni pensas pri unuopa leono.
- ***Rozo** estas **floro** kaj **kolombo** estas **birdo**.* [FE.5] Temas pri specoj, ne pri individuoj.
- *Karlo estas **kuracisto**.* La vorto *kuracisto* ne servas por identigi, sed por diri, kian profesion havas Karlo.
- *Elizabeto estas **patrino de tri infanoj**.* La frazparto *patrino de tri infanoj* estas uzata ne por montri, kiu Elizabeto estas, sed por informi, kia homo ŝi estas.
- *Tio estas **ŝtono**.* Oni ne volas diri, ke tio estas certa individua ŝtono, sed oni volas informi, ke tio apartenas al la speco ŝtonoj.
- ***Gitaro** estas **instrumento kun ses kordoj**.* Oni parolas ĝenerale pri speco de instrumento.
- *Vi vere loĝas en **bela apartamento**!* La frazparto *bela apartamento* ne servas por identigi certan apartamenton, sed por montri, kia estas la loĝejo.
- ***Akvo** bolas je cent gradoj.* Oni ne parolas pri certa kolekto de akvo, sed pri la substanco akvo ĝenerale.
- ***Ĉevalo** estas pli utila ol **hundo**.* Temas pri du bestospecoj.

### Speco kvazaŭ konata individuo

Iafoje oni rigardas specon kiel unu imagan konatan individuon, kaj uzas *la*. Tio estas sufiĉe ofta en formala aŭ filozofieca stilo. En tiaj okazoj temas klare pri la tuta speco:

- ***La gitaro** estas tre populara instrumento.* Oni prezentas instrumento-specon kvazaŭ temus pri unu certa konata instrumento. Aŭ: ***Gitaro** estas ...*
- ***La kato** preferas varman klimaton.* Oni prezentas bestospecon kiel unu konatan individuan beston. Oni ankaŭ povus diri: ***Kato** preferas ...*
- ***La urso** troviĝas kaj en Eŭropo kaj en Ameriko.* La diraĵo ne povus validi pri unu sola urso. Tial ne diru: **Urso troviĝas kaj en Eŭropo kaj en Ameriko.**
- ***La lupo** estas formortanta en Eŭropo.* La tuta bestospeco estas malaperanta. Oni do ne povus diri: ****Lupo** estas formortanta en Eŭropo.** La celita signifo validas nur, se oni pensas pri ĉiuj lupoj en Eŭropo.
- *Kian profiton havas **la homo** de ĉiuj siaj laboroj, kiujn li laboras sub la suno?* [Pr.1] *La homo* = *ĉiu homo*, *la homoj*, *ĉiuj homoj*, *la homaro*.
- ***La saĝulo** havas siajn okulojn en la kapo, kaj **la malsaĝulo** iras en mallumo.* [Pr.2] *La saĝulo* = *ĉiuj saĝuloj*. *La malsaĝulo* = *ĉiuj malsaĝuloj*.
- *En **la printempo** la glacio kaj la neĝo fluidiĝas.* [FE.39] *La printempo* = *ĉiuj printempoj*.
- *La invento de **la rado** revoluciis la mondon.*

Se oni ĉi tiel prezentas specon uzante *la*, oni devas atenti, ke ne estiĝu konfuzo, ĉu oni parolas pri efektiva individuaĵo, aŭ pri speco prezentata kvazaŭ individuaĵo.

Se O-vorto aperas kiel perverba priskribo, oni nepre ne uzu *la*, se temas nur pri speco: *Karlo estas **advokato**.* Se oni diras *Karlo estas **la advokato***, tiam la signifo estas "Karlo estas tiu certa advokato, kiun vi konas" aŭ "Karlo estas tiu advokato, pri kiu ni nun parolas" aŭ simile.

### Speco prezentata multe-nombre

Se temas pri nombrebla afero, oni ankaŭ povas prezenti specon per multe-nombra vorto. Kiam oni parolas pri specoj, la diferenco inter unu-nombro kaj multe-nombro ofte estas malgrava:

- ***Leonoj** estas **bestoj**.* = *Leono estas besto.*
- ***Rozoj** estas **floroj** kaj **kolomboj** estas **birdoj**.*
- ***Angloj** ĝenerale parolas pli malrapide ol **hispanoj**.*
- ***Ursoj** troviĝas kaj en Eŭropo kaj en Ameriko.*
- ***Gitaroj** estas **instrumentoj kun (po) ses kordoj**.*
- ***Ĉevaloj** estas pli utilaj ol **hundoj**.*

Sed oni ne diru: **Karlo estas kuracistoj.** Karlo estas nur unu homo, kaj li ne povas esti pluraj kuracistoj.

Oni ankaŭ povas uzi multe-nombran vorton kun *la*, se temas emfaze pri la tuta speco. Sed nepre ne, se la O-vorto rolas kiel perverba priskribo:

- ***La leonoj** estas bestoj.* Sed ne: **La leonoj estas la bestoj.**
- ***La rozoj** estas floroj kaj **la kolomboj** estas birdoj.*
- ***La angloj** ĝenerale parolas pli malrapide ol **la hispanoj**.*
- ***La ursoj** troviĝas kaj en Eŭropo kaj en Ameriko.*
- ***La lupoj** estas formortantaj en Eŭropo.* Temas klare pri la tuta bestospeco. Tial *lupoj* sen *la* ne taŭgas.
- ***La gitaroj** estas instrumentoj kun (po) ses kordoj.*
- ***La ĉevaloj** estas pli utilaj ol **la hundoj**.*

### 9.1.5. *La* — specialaj uzoj

#### *La* anstataŭ poseda pronomo

Ofte oni uzas *la* anstataŭ poseda pronomo (§11.2), se la kunteksto klare montras, kiu la posedanto estas. Tio aparte ofte okazas, kiam oni parolas pri korpopartoj, vestaĵoj aŭ parencoj. Tiam oni tre ofte preferas *la*:

- *Li levis **la kapon**. = Li levis sian kapon.*
- *Mi montris per **la fingro**, kien li iru. = ... per mia fingro ...*
- *Ŝi lavis al si **la piedojn**. = Ŝi lavis siajn piedojn.*
- *La vojkamarado balancis **la kapon** kaj estis tre malĝoja.* [FA1.73] *= ... balancis sian kapon ...*
- *La randon de **la ĉapelo** li ofte ektuŝas per **la mano**.* [M.167] *= ... de sia ĉapelo ... per sia mano.*
- *Kien vi volas iri, ke vi metis sur vin **la festan surtuton**?* [FA3.96] *= ... vian festan surtuton?*
- *Diru al **la patro**, ke mi estas diligenta.* [FE.8] *La patro = mia patro* (la patro de la parolanto). Oni tamen ofte uzas la vortojn *Patro* kaj *Patrino* (kun komenca majusklo) kvazaŭ proprajn nomojn sen *la*. Tiel oni ofte parolas ene de familio. Se la parolanto kaj la aŭskultanto estus samfamilianoj, la frazo do povus esti: *Diru al Patro, ke mi estas diligenta.* La karesformojn *paĉjo* (§38.2.6) kaj *panjo* (§38.2.25) oni ĉiam uzas propranomece sen *la*, kiam oni parolas pri la propraj gepatroj: *Diru al **Paĉjo/paĉjo**, ke ...*

#### *La* anstataŭ *ĉiuj*

Kiam ne estas risko pri miskompreno, oni povas uzi *la* anstataŭ *ĉiuj*, sed *la* ne estas same insista kiel *ĉiuj*:

- ***La gastoj** eksidis ĉe la tablo. ≈ Ĉiuj gastoj eksidis ... Ĉiuj* insistas pri tio, ke neniu gasto mankis. Kun *la* povus esti, ke eble mankis iu, sed tion oni opinias malgrava.
- *Ĉi-vespere **la angloj** prezentos teatraĵon en la kongresejo. La angloj ≈ ĉiuj angloj*. La situacio (kongreso) tamen limigas la sencon de *ĉiuj angloj*. Temas pri (pli-malpli) ĉiuj angloj, kiuj partoprenas en la kon-

greso, kaj ne pri ĉiuj angloj de la mondo. Alia interpreto estas, ke temas pri grupo, kiu kvazaŭ reprezentas ĉiujn anglojn en la kongreso.

Ofte, kiam oni parolas ĝenerale pri speco (§9.1.4), *la* egalas pli-malpli al *ĉiu* aŭ *ĉiuj*.

### *La* antaŭ lingvonomoj

*La* estas uzata antaŭ lingvonomoj (§35.4), kiuj konsistas el A-vorto plus la vorto *lingvo* (ofte subkomprenata). Oni uzas *la*, ĉar oni rigardas la lingvojn kiel unikaĵojn: *la angla (lingvo)*, *la ĉina (lingvo)*, *la nederlanda (lingvo)* k.a. Ekzistas nur unu angla lingvo, nur unu ĉina k.t.p. (Efektive ekzistas ofte pluraj variantoj de tiaj lingvoj, sed normale oni ignoras tion.)

Oni tamen ne uzu *la* ĉe tiuj lingvoj, kiuj havas propran O-vortan nomon, ekz. *Esperanto*, *Ido*, *Volapuko*, *Latino*, *Sanskrito* k.a. (§35.4)

### *La* antaŭ *plej* kaj *malplej*

Kiam *plej* aŭ *malplej* (§14.3.15) ĉeestas, temas normale pri io unika, kaj sekve oni uzas *la*:

- *La malfeliĉa infano forkuris kaj kaŝis sin en* ***la plej proksima arbaro****.* [FE.21]
- *Li estas tre kredema: eĉ* ***la plej nekredeblajn aferojn****, kiujn rakontas al li* ***la plej nekredindaj homoj****, li tuj kredas.* [FE.41]
- *El ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas* ***la plej juna*** [infano]. [FE.10]
- *Kelkaj homoj sentas sin* ***la plej feliĉaj*** [homoj]*, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj.* [FE.32]

Se temas pri komparo inter du individuaĵoj aŭ du grupoj, oni uzas kutime *la (mal)pli* anstataŭ *la (mal)plej*:

- *Unu vidvino havis du filinojn.* ***La pli maljuna*** [filino] *estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon.* [FE.11]
- *Ĉu tiam via plej aĝa filino ne havus la devon subtenadi la ekzistadon, zorgi pri la edukado kaj bona direktado de* ***la malpli aĝaj gefratoj****?* [M.87] Oni faras komparon inter unuflanke la pli aĝa filino kaj aliflanke ĉiuj ŝiaj malpli aĝaj gefratoj.

Kelkfoje *plej* ne montras ion unikan, sed plej altan gradon de eco aŭ maniero. Tiam oni ne uzu *la*:

- *Eĉ* ***vulpo plej ruza*** *fine estas kaptata.* [PE.285] Ne temas pri certa konata vulpo, sed pri iu ajn vulpo maksimume ruza.
- *Li ekaŭdis bruan tonon, kiu povis ektimigi la koron eĉ de* ***plej kuraĝa viro****.* [FA1.156] Temas ne pri certa difinita kuraĝa viro, sed pri la kategorio de plej kuraĝaj viroj.
- *Ĉiuj floroj brilis en* ***plej belegaj koloroj****.* [FA2.135] Temas pri speco de koloroj. Se oni aldonus *la*, temus pri ĝuste tiuj koloroj, kiuj estas plej belaj, kaj la parolanto supozus, ke la aŭskultanto scias precize, kiuj estas tiuj koloroj.

- *Li estas **plej laca** en la mateno.* Ne temas pri komparo inter diversaj personoj, sed pri komparo inter diversaj lacecoj de unu sama persono en diversaj tempoj.
- *Kiu venas **plej frue**, sidas **plej ĝue**.* [PE.535] *Plej* ne staras antaŭ O-vorta frazparto, sed antaŭ E-vorta frazparto.
- *Ŝi hontis siajn larmojn kaj deziris kaŝi ilin kiel eble **plej rapide**.* [M.25]

*La* eĉ estas tiel ofta antaŭ *plej*, ke oni ofte uzas ĝin pro nura kutimo, eĉ kiam ne temas vere pri io konata aŭ unika:

- *Por vi mi en **la plej malluma nokto** irus al la fino de la mondo.* [M.8] Ne temas pri difinita unika nokto, sed pri iu ajn nokto maksimume malluma. Pli bone estus sen *la*.
- ***La plej multajn publikajn parolojn** pri nia afero havis sinjoro Chr. Schmidt..* [OV.146] Ne temas vere pri konataj aŭ unikaj paroloj, sed pri komparado de kvantoj. Oni tute bone povas forlasi *la*, sed ordinare oni ja uzas *la* en *la plej (mal)multaj*.

Zamenhof eĉ uzis *la plej* ĉe E-vortaj frazpartoj:

- *Malsupre en la domo estas **la plej bele** kaj tie oni sin sentas **la plej oportune**.* [FA1.86] Zamenhof uzis *plej*, ĉar temas pri komparo inter pluraj belecoj kaj oportunecoj. En la domo troviĝas do la plej bela el ĉiuj belecoj, kaj la plej oportuna el ĉiuj oportunecoj. Nuntempe oni tamen preferas ne uzi *la* ĉe E-vortaj frazpartoj. Zamenhof en la komenca tempo uzis *la* tiamaniere eĉ ene de O-vorta frazparto, kiu jam havis *la*: **<u>la</u> sonojn **la plej multe** komunajn al ĉiuj plej gravaj lingvoj** [LR.62]. Tia uzo estas evitinda.

## Imagata difiniteco

Kiam oni parolas pri imagata okazo, oni ofte uzas *la*, kiam temas pri certa individua afero, kiu apartenas nur al tiu imagata okazo, kaj kiu estas kvazaŭ konata ene de tiu imagata situacio:

- *Propran nomon oni povas nun skribi tiel, kiel ĝi estas skribata en **la gepatra lingvo** de ĝia posedanto.* [LR.63] En ĉiu unuopa okazo estas nur unu certa lingvo. En ĉiu aparta okazo, la lingvo estas do konata. Se oni ne uzus *la*, oni komprenus, ke iuj posedantoj havas plurajn gepatrajn lingvojn.
- *Ĉiun fojon, kiam mortas bona infano, anĝelo de Dio malleviĝas sur la teron, prenas **la mortintan infanon** sur siajn brakojn* [...] [FA2.21] Oni parolas pri ĝenerala principo, sed oni devas uzi *la* por montri, ke la anĝelo ĉiufoje prenas ĝuste tiun bonan infanon, kiu estas mortinta tiufoje. Se oni ne uzus *la*, oni supozus, ke la anĝelo ĉiufoje prenas iun ajn mortintan infanon.

### *La* komence de rakonto

En literaturo oni ofte uzas *la* tuj en la komenco de rakonto, kvankam la leganto tute ne scias pri la aferoj:

- ***La matena simfonio** de **la kazernoj** vekadis **la svene dormantan urbon**.* Komenco de *Sur Sanga Tero* de Julio *Baghy*. La leganto ne povas scii, pri kiu urbo temas, kaj ne scias ion pri la matena simfonio, kaj tute ne pri la kazerno, ĉar la rakonto apenaŭ komenciĝis.
- ***La urbestro** staris ĉe **la malfermita fenestro**.* FA3.73 Komenco de fabelo.

Tia ĉi nenormala uzo de *la* donas al la leganto la impreson, kvazaŭ li mem ĉeestas, kaj povas vidi la okazaĵojn per propraj okuloj.

Oni ofte uzas ankaŭ personajn pronomojn (§11.1) ĉi tiel komence de rakonto: *Post jarmiloj **ili** alflugos sur la flugiloj de la vaporo tra la aero trans la monda oceano! La junaj loĝantoj de Ameriko vizitos la maljunan Eŭropon.* FA3.54 Komenco de fabelo. Nur en la dua frazo oni ekscias, kiuj "ili" estas.

### Konciza lingvaĵo

En poezio kaj proverboj, kie oni deziras tre mallongajn frazojn, oni iafoje forlasas *la*: *Al ĉevalo donacita oni **buŝon** ne esploras.* PE.590 *Buŝon* = *la buŝon*, *ĝian buŝon*.

### Citaĵoj

Iafoje oni uzas *la* antaŭ vortetoj, kiuj ne havas sian normalan frazrolon, sed estas iel cititaj. *La* tiam vere rilatas al subkomprenata O-vorto antaŭ la citaĵo. ***La "tuj"** de sinjoroj estas multe da horoj.* PE.879 = ***La vorto "tuj"** signifas por sinjoroj "multe da horoj".* Legu pli pri citaĵoj en §36.

## 9.1.6. *La* ĉe propraj nomoj

Ĉe propraj nomoj (§35) la uzado de *la* estas bedaŭrinde iom malsimpla, kaj ne tute klare fiksita.

Oni faras distingon inter normalaj propraj nomoj, ĉe kiuj oni normale ne uzas *la*, kaj ordinaraj O-vortoj kiel propraj nomoj, ĉe kiuj oni normale ja uzas *la*. (En multaj lernolibroj oni trovas la trosimpligitan regulon: "antaŭ propraj nomoj oni ne uzas *la*". Tiu simpligo ne estas prava.)

Ankaŭ aliaj difiniloj povas uziĝi ĉe propraj nomoj (§9.2).

### Normalaj propraj nomoj

Normalaj propraj nomoj estas vortoj kaj esprimoj, kiuj estas **per si mem** propraj nomoj. Pri tio decidas la ĉefvorto de la nomo. Ekz. *Norda Ameriko* estas normala propra nomo, ĉar la ĉefvorto *Ameriko* ĉiam estas propra nomo per si mem.

Normalaj propraj nomoj ne bezonas *la*, ĉar ili ĉiam nomas ion, kion oni supozas konata de la alparolato. Teorie ili nomas unikaĵojn. Multaj propraj nomoj tamen ne estas vere unikaj, sed efektive nomas plurajn individuojn, sed kiam oni uzas propran nomon, oni normale pensas pri unu certa individuo, kaj supozas, ke la aŭskultanto komprenos, pri kiu temas. Normale estus eraro aldoni *la* al tiaj nomoj:

- *Morgaŭ mi veturos* ***Parizon****.* FE.28 *Parizo* estas propra nomo de la ĉefurbo de Francujo. Ĝi ĉiam nomas unikan difinitan urbon, kaj ne havu *la*.
- ***Aleksandro*** *ne volas lerni, kaj tial mi batas* ***Aleksandron****.* FE.9 *Aleksandro* estas propra nomo de knabo. Uzante ĝin oni ĉiam celas certan difinitan knabon, kiun la alparolato konas. Oni ne uzu *la*. Efektive ja ekzistas multaj Aleksandroj, sed kiam oni uzas tian nomon, oni ĉiam celas unu certan el ili, kiun la aŭskultanto konas.
- ***Zamenhof*** *kreis* ***Esperanton****. Zamenhof* estas ĉiam propra nomo. Ĝi ne havu *la*. *Esperanto* estis unue kaŝnomo de Zamenhof. Nun ĝi estas propra nomo de lia lingvo. La vorto *esperanto* estas ordinara vorto (= "persono, kiu esperas"), sed la lingvonomo estas rigardata kiel tute alia vorto.

Ĉiuj landonomoj (§35.4) estas traktataj kiel normalaj propraj nomoj. Ili do ne havu *la*:

- *La rusoj loĝas en* ***Rusujo*** *kaj la germanoj en* ***Germanujo****.* FE.40

Fremdlingvaj propraj nomoj (§35.2) estas traktataj kiel normalaj propraj nomoj (sen *la*). Ankaŭ citaĵaj nomoj de libroj k.s. (§36) ordinare estas tiel traktataj.

### Nomo kun rekta priskribo

Iafoje normala propra nomo havas A-vorton kiel rektan priskribon. Se tiu A-vorto ne estas mem parto de la propra nomo, oni normale ja uzas *la*, kvazaŭ temus pri ordinara O-vorto. Tion oni faras precipe, kiam temas pri elekto (reala aŭ ŝajna) inter pluraj aferoj kun la sama nomo:

- *Duoble montriĝis la bildo de Venero, de* ***la surtera Venero****.* FA1.213 Venero estas propra nomo de diino. Unue *Venero* aperas sen *la*, laŭ la bazaj reguloj por normalaj propraj nomoj. Poste ĉeestas la rekta priskribo *surtera*, kaj oni devas uzi *la* por montri difinitecon. Temas kvazaŭ pri du malsamaj Veneroj, la ĉiela Venero kaj la surtera Venero.
- ***La malgranda Janjo*** *per larĝe malfermitaj okuloj rigardis la murojn.* M.6
- *Ĉiuj konas* ***Londonon****, la ĉefurbon de Britujo, sed ne ĉiuj konas* ***la aliajn Londonojn*** *en Usono kaj Kanado. Londono* ne havas *la*, ĉar ĝi estas klare difinita per si mem. La esprimo *aliaj Londonoj* tamen havas la priskribon *aliaj*. Oni do devas uzi *la*, ĉar oni parolas pri ĉiuj aliaj Londonoj.
- *Multaj vizitis Londonon, la ĉefurbon de Britujo, sed mi vizitis ankaŭ* ***aliajn Londonojn****.* Ankaŭ ĉi tie *Londono* havas priskribon, sed oni ne uzu *la*, ĉar ne temas pri ĉiuj aliaj Londonoj, kaj la aŭskultanto ankaŭ ne povas scii, precize pri kiuj Londonoj temas.

- *Svisujo, kiu* [...] *estas la plej neŭtrala lando en* ***la tuta Eŭropo****, estas la plej bona loko por kongreso neŭtrale-homa.* [OV.436] Kiam *tuta* aperas kiel rekta priskribo antaŭ propra nomo, oni normale uzas *la*.
- *Tio ĉi estas ne stilo de* ***bona Esperanto****, sed stilo de malklera homo.* [LR.149A] Ĉi tie mankas *la*, ĉar *bona Esperanto* ne estas uzata por identigi certan lingvon, sed por paroli pri speco de lingvaĵo.

Se temas ne pri elekto inter pluraj aferoj kun la sama nomo, sed pri diversaj partoj de unu afero, tiam oni normale ne uzas *la*, kvankam ĉeestas A-vorta priskribo:

- *Eŝvajlero situas en* ***meza Rejnlando*** *en Germanujo en* ***meza Eŭropo***. Ne temas pri pluraj Rejnlandoj aŭ pluraj Eŭropoj, sed pri la meza parto de Rejnlando kaj la meza parto de Eŭropo.
- *En* ***orienta Azio*** *multaj landoj evoluas tre rapide. = En la orienta parto de Azio ...*
- *Demokratio naskiĝis en* ***(la) antikva Grekujo***. Se oni rigardas la nunan Grekujon kaj la antikvan Grekujon pli-malpli kiel du malsamajn landojn, oni uzas *la antikva Grekujo* kun *la*. Sed oni ankaŭ povas pensi pri diversaj periodoj de la historio de unu lando. Tiam oni ne uzas *la*.

Se rekta priskribo de normala propra nomo ne estas A-vorto, sed alispeca priskribo, tiam oni normale ne uzas *la*. Nur se tia priskribo servas emfaze por fari distingon inter pluraj individuoj kun la sama nomo, oni povas uzi *la* por tion klare montri:

- *Tio estis* ***Kristino el la erikejo***. [FA3.94] *El la erikejo* estas rekta priskribo de la nomo *Kristino*, sed ĝi ne estas A-vorto.
- *Mi ekskribos pri ĉio al* ***Trjapiĉkin en Peterburgo.*** [Rz.66]
- *Pasintjare mi vizitis Berlinon, sed ne* ***la Berlinon de Germanujo***. *Mi vizitis unu el la multaj Berlinoj en Usono.* Ĉi tie temas klare pri distingo inter pluraj urboj kun la sama nomo, kaj *la* estas bezonata.
- *Mi daŭre revas promeni tra* ***la Parizo de 1900***. La parolanto pensas pri la tiama Parizo kvazaŭ alia urbo ol la nuna Parizo.

Se A-vorta priskribo mem estas parto de la propra nomo, oni normale ne uzas *la*:

- *Brazilo estas la plej granda lando en* ***Suda Ameriko***. La A-vorto *Suda* estas parto de la nomo *Suda Ameriko*. (Pli rekomendinda estas tamen la unuvorta formo *Sud-Ameriko*.)
- ***Sankta Petro***. ***Sankta Johano***. En tiaj ĉi nomoj de sanktuloj la priskribo *Sankta* estas kiel parto de la nomo, tial *la* ne estas uzata. Ĉe Zamenhof oni tamen trovas tiajn nomojn ankaŭ kun *la*. Kiam sanktula nomo aperas kun *la*, povas esti, ke fakte temas pri festotago, preĝejo aŭ simila afero, kiu estas nomita laŭ tiu sanktulo: *la Sankta Bartolomeo* [Rn.24] = “la preĝejo de Sankta Bartolomeo”.

### Klasikaj religiaj verkoj

Ĉe la nomoj de iaj gravaj klasikaj religiaj verkoj oni normale uzas *la*, ankaŭ kiam ne ĉeestas rekta priskribo, kvankam estas tute eble rigardi tiujn vortojn kiel proprajn nomojn: *la Biblio* (aŭ *La Sankta Biblio*), *la Korano* (aŭ *La Nobla Korano*), *la Talmudo* k.a. *La Kristaneco montris al li en* ***la Biblio*** *la konsolon pri eterna vivo.* [FA3.116] *Ĉu ne tiel estas skribite en* ***la Korano****?* [FA4.225].

> **Noto:** Simile oni uzas la nomojn de la ne-religiaj verkoj Odiseado, Eneado kaj Iliado kun *la*: *la Odiseado*, *la Eneado*, *la Iliado*. Tiuj vortoj estas (iom kuriozaj) kunmetaĵoj kun la sufikso AD (§38.2.2): *Odiseo* (propra nomo de persono) + AD → *odiseado* (vojaĝo de Odiseo) → *la Odiseado* (nomo de rakonto pri lia vojaĝo).

## Ordinaraj O-vortoj kiel propraj nomoj

Antaŭ ordinaraj vortoj, kiuj fariĝis propraj nomoj, oni normale ja uzas *la*, ĉar la vortoj ne per si mem montras unikaĵojn:

- *Li kreis* ***la Grandan Ursinon****, Orionon, kaj Plejadojn.* [Ij.9] Estas tri propraj nomoj de stelaroj. Ĉiuj tri estas egale unikaj. La du lastaj nomoj estas normalaj propraj nomoj, kaj ne havu *la*. La unua nomo tamen konsistas el ordinaraj vortoj, kaj bezonas *la*.
- *Kaj tiam* ***la Nokto*** *diris: "Tenu vin dekstre kaj eniru en la malluman pinarbaron, mi vidis, ke tien foriris* ***la Morto*** *kun via malgranda infano."* [FA3.2] La nokto kaj la morto rolas en fabelo kiel personoj kun propraj nomoj (tion montras la majuskla skribo), sed *nokto* kaj *morto* estas ordinaraj O-vortoj, kaj tial bezonas *la*.
- *En unu el la domoj de* ***la Orienta strato*** *en Kopenhago, proksime de* ***la Nova Reĝa Bazaro****, estis iam granda gastokunveno.* [FA1.113] Estas du propraj nomoj, kiuj konsistas el ordinaraj vortoj. Ili havas *la*. La tria nomo, *Kopenhago*, estas normala propra nomo. Ĝi ne havas *la*.
- *Dio kondukis la popolon ĉirkaŭire* [...] *al* ***la Ruĝa Maro****.* [Er.13] La marnomo konsistas el ordinaraj vortoj.
- *La plej suda parto de la afrika kontinento estas* ***la Bonespera Kabo****.*
- *Irano situas ĉe* ***la Persa Golfo****.*

Okazas tamen, ke oni forlasas *la* ĉe tiaj ĉi nomoj, precipe kiam temas pri tre konataj nomoj. La uzado ne estas tute unueca:

- *Ĉu vi estas membro de (***la***) Universala Esperanto-Asocio?* Oni povas uzi *la*, sed normale forlasas ĝin ĝuste ĉe ĉi tiu nomo, ĉar ĝi estas tiel konata. Mallongigojn de tiaj nomoj oni tamen plej ofte uzas sen *la*.
- *Ni vojaĝis al (***la***) Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj.* La nomo de tiu ŝtato (unio de pluraj emirlandoj) jen aperas kun *la*, jen sen *la*.

### Multe-nombraj nomoj

Propraj nomoj, kiuj havas jam en sia baza formo J-finaĵon, ofte kondutas kiel ordinaraj O-vortoj (kun *la*), ankaŭ kiam fakte temas pri normala propra nomo: *(la) Alpoj* (montaro en Eŭropo), *(la) Andoj* (montaro en Sud-Ameriko), *(la) Filipinoj* (insulara ŝtato en Azio).

## Propraj nomoj kiel priskriboj

Kiam propra nomo aperas kiel postmetita identiga priskribo (§25.2) de ordinara O-vorto, kaj la tuta frazparto estas laŭsence difinita kaj konata, tiam oni devas uzi *la*, ĉar la ĉefvorto de la tuta frazparto estas ordinara ne-propranoma O-vorto:

- *la rivero **Nilo***
- *la fama aŭtoro **Ŝekspiro***
- *la strato **Graniczna*** [M.4]
- *la monato **Majo*** [FA3.18]

Ordinare la ĉeesto de propra nomo estas sufiĉa kialo por diri, ke temas pri io difinita kaj konata. Sed eventuale, se oni volas diri, ke estas unu el pluraj kun tiu nomo, kaj se la aŭskultanto ne scias, pri kiu el ili temas, tiam oni eble povas uzi tiajn esprimojn sen *la*: *Mi vojaĝis kune kun **amiko Johano**.* = *... kun amiko, kiun vi ne konas, sed kiu nomiĝas Johano.* Praktike oni tre malofte tiamaniere uzas propranoman priskribon ĉe O-vorto sen *la*. Pli ofte oni diras ekz. *... kun amiko, kiu nomiĝas Johano*, ĉar tio estas pli klara.

Tia propranoma priskribo povas ankaŭ havi la formon de A-vorto:

- *la **Mediteranea** maro* = *la maro, kiu nomiĝas Mediteraneo* = *la maro Mediteraneo* = *Mediteraneo*. La longa esprimo *la Mediteranea maro* estas do tute samsignifa kiel simpla *Mediteraneo*. La longa esprimo povas esti utila, ekz. kiam oni volas aparte atentigi, ke Mediteraneo estas maro.
- *la **Jutlanda** duoninsulo* [FA4.58] = *la duoninsulo Jutlando* = *Jutlando* [FA4.19]
- *la **Atlantika** oceano* = *la oceano Atlantiko* = *Atlantiko*
- *la **Esperanta** lingvo* = *la lingvo Esperanto* = *Esperanto*

Ial oni neniam uzas nomojn de homoj en tia maniero. Anstataŭ *la aŭtoro Ŝekspiro* oni neniam diras **la ŝekspira aŭtoro**.

## Titoloj

Vortojn kiel *sinjor(in)o*, *fraŭl(in)o*, *doktor(in)o*, *profesor(in)o* k.s. oni ofte uzas antaŭ propra nomo de persono. Laŭ la ordinaraj reguloj, oni tiam uzu *la*, ĉar la tuto estas klare difinita per la propra nomo:

- *La ekspedejo de **la sinjoroj Snitchey kaj Craggs** kuŝis tre oportune sur la bazaro.* [BV.36] = *... de la sinjoroj, kiuj nomiĝis Snitchey kaj Craggs ...*
- ***La doktoredzino A.** vizitis hodiaŭ **la gedoktorojn P**.* [FE.36]
- ***La reĝo Johano** legis en la romano pri **la reĝo Arturo**.* [FA1.121]

Sed kelkaj tiaj antaŭesprimoj ofte uziĝas kvazaŭ parto de la propra nomo, kaj tiam ne vere informas, kia estas la persono. Ili uziĝas pli-malpli rutine pro ĝentileco, respekto aŭ simile. En tiaj okazoj oni ofte forlasas la artikolon:

- *Li fianĉiĝis kun **fraŭlino Berto**.* [FE.39] Oni ankaŭ povas uzi ... *kun **la** fraŭlino Berto*, sed tiam la vorto *fraŭlino* fariĝas pli grava, pli informoplena.

- ***Sinjorino Zminska** hieraŭ multe parolis al mi pri vi.* [M.41]
- *Sekve **barono Brambeus** estas vi?* [Rz.46]
- *Se nun troviĝus tiaj reĝoj, kiel **reĝo Arturo**, tiam troviĝus ankaŭ tiaj kavaliroj, kiel **sinjoro Tvent** kaj **sinjoro Gaudian**.* [FA1.121]
- ***Fraŭlino Klaro** kaj **fraŭlino Kristino** ne povas plenumi la tutan kudradon.* [M.96]

Ankaŭ la vorton *numero* oni ofte uzas en tia titoleca maniero sen *la* antaŭ numeroj: *Li loĝas en (ĉambro) **numero 110** (= cent dek). Ĉu vi legis **numeron 12** (= dek du) de tiu gazeto?* Simile: *paĝo (numero) 123*, *semajno 52*, *paragrafo 23*. Sed ĉe jaronumeroj oni ordinare uzas artikolon antaŭ la vorto *jaro*: *La unua broŝuro pri la lingvo Esperanto aperis en la fino de **la jaro 1887**.* [OV.161] (Vidu ankaŭ la klarigojn pri datoj, §23.9.)

Se titoleca antaŭesprimo havas rektan priskribon, ekz. A-vorton, tiam oni ordinare ja uzas *la*: *Plej afable brilis la okuloj de la filino, **la ĉarma fraŭlino Klaro**.* [FA4.185] *Li fianĉiĝis kun **la juna fraŭlino Berto**. **La genia doktoro Zamenhof** kreis Esperanton. Ĉu vi legis **la interesan numeron 100** de tiu gazeto?*

Se temas pri la frazrolo alparolo (§12.1.2), oni nepre ne uzu *la* antaŭ titolo: ***Sinjorino Szwejc!** – ŝi diris, – mi prezentas al vi **sinjorinon Marta Swicka**.* [M.108] ***Kara fraŭlino Klaro**, – ŝi diris, – vi scias bone, kiel mi zorgas pri la sano de miaj laborantinoj.* [M.109]

## Pruntitaj artikoloj

Iuj normalaj propraj nomoj havas en iuj naciaj lingvoj difinan artikolon, kiu estas kvazaŭ parto de la nomo. En Esperanto tiaj nomoj ne havu artikolon. Ekz. *Hago* (urbo en Nederlando) neniam havas artikolon en Esperanto, kvankam en pluraj lingvoj ĝi havas artikolon, kiu estas firma parto de la nomo (ekz. *Den Haag*, *La Haye*, *The Hague*, *l'Aia*). Same oni uzas *Havro* sen artikolo, kvankam en la franca estas ĉiam *Le Havre* kun artikolo. Arabaj propraj nomoj ofte havas difinan artikolon en la araba, sed en Esperanto ili ne havu artikolon: *Kairo*, *Riado*, *Kuvajto* k.t.p. Sed iafoje oni tamen vidas tiajn artikolojn ankaŭ en Esperanto: *la Himalajo* [FA1.188], *la Atlantiko*, *la Mediteraneo* (normale sen artikoloj). Tio estas neĝusta, sed iafoje tolerebla. Propraj nomoj ofte rifuzas tute plene esperantiĝi.

Ĉe iuj ĉi tiaj nomoj origina artikolo fariĝis parto de la Esperanta radiko: *La-Pazo* (aŭ *Lapazo*), *La-Plato* (aŭ *Laplato*), *El-Salvadoro* (aŭ *Elsalvadoro*, *Salvadoro*), *Los-Anĝeleso* (aŭ *Losanĝeleso*), *Alĝero*. ("*La*", "*el*" kaj "*los*" estas hispanaj artikoloj. "*Al*" estas araba artikolo.)

## Nomoj de tempodividoj

Monatonomoj (*Januaro*, *Februaro*, *Marto*, *Muharamo*°, *Ramadano*, *Brumero* k.a.) estas normalaj propraj nomoj. Ili do normale ne havas *la*, tute laŭ la bazaj reguloj por tiaj nomoj (kaj estu skribataj kun komenca majusklo, §35.5):

- *Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de* ***Februaro*** *de la jaro mil sepcent tridek dua.* [FE.12] *Februaro* estas difinita konata afero. Se ĝi ne estus normala propra nomo, ĝi nepre havus *la*.

Nomoj de festoj (*Kristnasko*, *Pasko*, *Pentekosto*, *Aŝuro*° k.a.) estas plej ofte traktataj kiel normalaj propraj nomoj sen *la*, kio estas rekomendinda, kvankam iuj (ekz. *Kristnasko*) fakte estas ordinaraj O-vortoj. La uzado tamen varias:

- *Al* ***Kristnasko*** *venis letero de ŝia patro.* [FA3.58] *= Al la tiujara Kristnasko ...*
- *Post* ***Aŝuro***° *li veturos al Teherano. = Post la ĉi-jara Aŝuro ...*
- *En la dek-kvara tago de la unua monato estu ĉe vi* ***Pasko****, festo septaga.* [Jĥ.45]
- *Ĉi tio estas la leĝo pri* ***la Pasko****.* [Er.12] La nomo *Pasko* sufiĉe ofte aperas kun *la* en la Biblio, sed tio ne estas imitinda.

Semajntagoj (*lundo*, *mardo*, *merkredo*, *ĵaŭdo*, *vendredo*, *sabato*, *dimanĉo*) ne estas propraj nomoj, sed ofte ili estas uzataj propranomece sen *la*, kvankam difinitaj kaj konataj:

- *Dum la tuta semajno ŝi estis malgaja kaj ploris multe da varmegaj larmoj; sed kiam venis* ***la dimanĉo****, ŝi diris: "Vere, nun mi sufiĉe suferis kaj luktis!* [...]*"* [FA2.101]
- *Hodiaŭ estas* ***sabato****, kaj morgaŭ estos* ***dimanĉo****.* [FE.20] Oni ne uzas *la*, ĉar *sabato* kaj *dimanĉo* ĉi tie nur informas pri la speco de tago. Ne temas pri propraj nomoj.
- *Mi intencas veni Bulonjon* ***ĵaŭdon****.* [L1.173] Difinita konata ĵaŭdo prezentata propranomece sen *la*.
- *"****Dimanĉon*** *ni nin vidos*." [...] *Venis* ***la dimanĉo****.* [FA3.60] Temas pri la sama dimanĉo, same konata ambaŭfoje, unuafoje propranomece sen *la*, duafoje kun *la*.

Sezonoj (*printempo*, *somero*, *aŭtuno*, *vintro*) kaj tagopartoj (*mateno*, *tagmezo*, *vespero*, *nokto* k.s.) estas ĉiam ordinaraj O-vortoj, kaj oni uzas *la* tute laŭ la normalaj reguloj:

- *En* ***somero*** *ni veturas per diversaj veturiloj, kaj en* ***vintro*** *ni veturas per glitveturilo.* [FE.34] *= En somera tempo ... en vintra tempo ...*
- *En* ***la printempo*** *la glacio kaj la neĝo fluidiĝas.* [FE.39] Ĉi tiu ekzemplo estas tute simila al la antaŭa, sed ĉi tie ja aperas *la*. Kiam oni parolas ĝenerale pri specoj, oni ofte povas uzi aŭ forlasi *la* depende de la stilo. Vidu *La* – specoj (§9.1.4).
- *Tiujn fabelojn ni aŭskultos en* ***vintro****.* [FA2.96] *= ... en vintra tempo. ... en iu vintro.*

- *Fariĝis **mateno**.* FA2.131 = *Fariĝis matena tempo.*
- ***La nokton** ŝi pasigis ĉe sia laboro.* FA1.170 Temas pri certa konata nokto. Tial *la* estas uzata, tute laŭ la bazaj reguloj por ordinaraj O-vortoj.
- *Ĉirkaŭas min **nokto**.* FA1.124 ≈ *Ĉirkaŭas min mallumo.*

Laŭ iuj gramatikistoj tiaj vortoj estas iafoje uzataj propranomece, sed temas ĉiam pri frazoj, en kiuj oni parolas pri speco de tempo, kaj en tiaj okazoj *la* estas ĉiuokaze nebezonata.

### Lingvonomoj

Lingvonomoj (§35.4) kun O-finaĵo (ekz. *Esperanto*) estas tute normalaj propraj nomoj. Oni do normale ne uzu *la* ĉe ili (§9.1.5).

### Mallongigitaj propraj nomoj

Mallongigojn de propraj nomoj faritaj el ordinaraj vortoj, oni plej ofte traktas kiel normalajn proprajn nomojn (sen *la*). La uzado tamen tre varias:

- *Mi trovis tiun vorton en (la) Plena Ilustrita Vortaro. → Mi trovis tiun vorton en **PIV**.* Antaŭ la plena nomo oni povas uzi *la*, sed antaŭ la mallongigo tio kutime ne okazas.
- *Tiujare la Universala Kongreso denove estos ekstereŭropa. → Tiujare **(la) UK** denove estos ekstereŭropa.* Mallongigoj de nomoj de kongresoj iafoje estas uzataj kiel normalaj propraj nomoj (sen *la*), sed alifoje kiel ordinaraj O-vortoj (je bezono kun *la*).
- *Ĉu vi estas membro de Universala Esperanto-Asocio? → Ĉu vi estas membro de **UEA**?* Oni povus uzi *la* antaŭ la plena nomo *Universala Esperanto-Asocio*, ĉar la ĉefvorto estas ordinara O-vorto, sed praktike tio apenaŭ okazas ĉe tiu ĉi tre konata nomo. Antaŭ la mallongigo *UEA* la artikolo *la* neniam aperas.

## 9.2. Aliaj difiniloj

Krom la difina artikolo *la* (§9.1), estas difiniloj ankaŭ la posedaj pronomoj, la tabelvortoj je U, A kaj ES, la vorteto *ambaŭ* kaj duondifina *unu*. Kiam ĉeestas la vorteto *ĉi* (§14.1.2), oni iafoje subkomprenas la difinilon *tiu*. Tiam *ĉi* kvazaŭ mem fariĝas difinilo (§14.1.2).

### Posedaj pronomoj

Posedaj pronomoj (§11.2) estas *mia*, *nia*, *via*, *lia*, *ŝia*, *ĝia*, *ilia*, *onia* kaj *sia* (kaj ankaŭ *cia*).

Kiam poseda pronomo aperas kiel priskribo de O-vorto, ĝi kalkuliĝas kiel difinilo. Plej ofte la efektiva senco estas difina (la alparolato scias, pri kiu temas). Sed oni tamen ne aldonas *la* (§9.1.1). Se oni anstataŭigas la posedan pronomon per subfrazo, kiu esprimas la posedanton, oni plej ofte devas aldoni *la*:

- ***Mia domo** estas granda. = La domo, kiu apartenas al mi, estas granda.*
- ***Viaj ŝtrumpoj** estas malpuraj. = La ŝtrumpoj, kiuj apartenas al vi, estas malpuraj.*

- *Li detruis **sian sanon**. = Li detruis la sanon, kiun li havis.*

Tamen iafoje, precipe kiam frazparto kun poseda pronomo aperas kiel perverba priskribo (§25.1), la efektiva senco povas esti nedifina:

- *Li estas **mia onklo**.* [FE.18] Li estas onklo de mi. Eble mi havas ankoraŭ aliajn onklojn.
- *Tion mi diras al vi, ĉar vi estas **mia samlandano**.* [FA4.202] *= ... vi estas samlandano de mi.* La celita senco estas nedifina.
- *Se iu intence mortigis **sian proksimulon** per ruzo, tiam eĉ de Mia altaro forprenu lin, ke li mortu.* [Js.20] Nedifina senco.

Se temas pri certa individuo, kiu tamen estas nekonata de la alparolato, oni povas por klareco aldoni la vorton *unu*: ***Unu mia amiko** estas advokato.* ***Unu el miaj amikoj** estas advokato.* Oni ankaŭ povas uzi *de*-esprimon kun aŭ sen *unu*: ***Amiko de mi** estas advokato.* ***Unu amiko de mi** estas advokato.*

Iuj provas uzi posedan pronomon kiel postpriskribon por montri nedifinan sencon: ***Amiko mia** estas advokato.* Tia uzo tamen ne estas ĝenerale akceptita, kaj ne ĉiuj komprenas, ke la nekutima vortordo celas montri nedifinan sencon. Normale oni do devas uzi iun el la pli klaraj esprimomanieroj montritaj ĉi-antaŭe.

Kiam poseda pronomo aperas sola (sen posta O-vorto aŭ A-vorto), ĝi ne estas difinilo. Por klare esprimi, ke oni celas difinitecon oni tiam ofte aldonas *la*, sed tio ne estas deviga:

- *Tiu ĉi libro estas **mia**.* Ĝi estas unu el miaj libroj – nedifina senco.
- *Tiu ĉi libro estas **la mia**.* Ĝi estas tiu konata libro, kiu apartenas al mi – difina senco.
- *Unu donis al **sia florejo** la formon de baleno; alia trovis pli bone, ke **ŝia florejo** similas je virineto de maro; sed la plej juna donis al **la sia** formon rondan, kiel la suno.* [FA1.82] *La sia = sia florejo*. Ĉiuj tri florejoj estas difinitaj. La unuaj du estas sufiĉe difinitaj per *sia* kaj *ŝia*, sed la tria estas menciita per sola poseda pronomo (sen la O-vorto *florejo*), kaj bezonas *la*.
- *Nu, certe mi legis **la vian**, kiel bone skribita!* [Rz.47] *La vian = vian verkon = la verkon, kiun vi faris*.
- *Via pano estas malpli freŝa, ol **mia**.* [FE.10] Jen Fundamenta ekzemplo, en kiu ne aperas *la* antaŭ *mia*, kvankam la senco estas *la pano, kiu apartenas al mi*. Oni tute rajtas diri *ol la mia* por plia klareco, sed tio ne estas deviga.

Iafoje en poezio k.s. oni ne sekvas la normalajn regulojn por posedaj pronomoj. Tian uzon oni (normale) ne imitu en ordinara lingvaĵo:

- *Patro **nia**, kiu estas en la ĉielo.* [UL.19] *= Nia patro ...*
- *Ho, la profeta **mia** antaŭsento!* [H.27] *= Ho, mia profeta antaŭsento!*
- *Eraras for la penso **mia**.* [FK.310] *= Eraras for mia penso.*
- *Kaj nun, Laerto, al l' afero **via**!* [H.11] *= ... al via afero!*

- *Mieno **lia** montris pli suferon, sed ne koleron.* [H.19] = *Lia mieno ...*

## Duondifina *unu*

Iuj lingvoj uzas specialan nedifinan artikolon, kiu ofte estas vorto simila al *unu*. Tia artikolo ne ekzistas en Esperanto. Plenan nedifinitecon oni montras simple per neuzo de difinilo. Sed oni iafoje uzas *unu* kiel **duondifinan artikolon**. Tia *unu* ne montras nombron, sed individuecon. Ĝi montras, ke temas pri io, kio estas nekonata al la aŭskultanto, sed konata al la parolanto:

- ***Unu tagon**, promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis.* [FE.39] La rakontanto per *unu* montras, ke li mem scias, en kiu tago tio okazis.
- ***Unu vidvino** havis du filinojn.* [FE.11] Komenco de fabelo. Ankoraŭ nur la rakontanto konas la vidvinon. (Alia teorie ebla interpreto estas matematika: "1 vidvino havis 2 filinojn, sekve 2 vidvinoj havis 4 filinojn". Sed tute ne temas pri tia kalkulado. Temas pri prezentado de rolantoj en fabelo.)
- *En **unu vilaĝo** loĝis du viroj, kiuj ambaŭ havis la saman nomon.* [FA1.13] Ili loĝis en vilaĝo konata de la parolanto, sed ne de la aŭskultanto.
- *En **unu tago**, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino.* [FE.15]
- ***Unu vesperon** fariĝis granda uragano: fulmis kaj tondris, forte pluvegis, estis terure.* [FA1.27]

La difina artikolo *la* estas pli-malpli deviga, kiam temas pri io konata al la aŭskultanto. Se oni forlasas *la*, oni montras la malan signifon, nedifinitecon. La duondifina artikolo *unu* tamen neniam estas deviga. Ĝi estas nuancilo, kiun oni uzu je bezono:

- *Vi devas legi **libron**.* Aŭ oni celas specan signifon, aŭ oni celas certan libron nekonatan al la aŭskultanto.
- ***Unu libron** vi devas legi, jen ĝi.* La aldonita *unu* montras, ke ne temas pri iu ajn libro, nek pri speco de libro, sed pri certa libro nekonata al la alparolato.
- *Mi volas, ke vi renkontu **unu amikon** de mi. Unu* estas uzata por emfazi, ke ne temas pri iu ajn el la amikoj de la parolanto.

La duondifina *unu* troviĝas en la *Fundamento*, kaj Zamenhof tre ofte uzis ĝin. Ĝi estas tre utila nuancilo, se oni ĝin ne trouzas. Iuj tamen pensas, ke tia *unu* estas nedifina artikolo uzata pro influo de naciaj lingvoj. Tial multaj hezitas uzi duondifinan *unu* timante fari eraron. Pro tio la duondifina *unu* fariĝis iom malofta nuntempe. Multaj preferas la vortojn *certa* kaj *iu*. Sed *iu* montras iom alian signifon, kaj *certa* estas multe pli emfaza ol *unu* (§23.1.3). Tamen, kiam temas pri tempovortoj, oni ankoraŭ vaste uzadas duondifinan *unu* tute laŭ la ĉi-antaŭe montritaj ekzemploj: *unu tagon ...*, *en unu vespero ...*, *unu fojon ...* k.s.

Legu pli pri specialaj uzoj de *unu* en §23.1.3.

### Tabelvortoj je U, A kaj ES

La tabelvortoj je U, A kaj ES (§15) estas difiniloj: *kiu*, *tiu*, *iu*, *ĉiu*, *neniu*, *kia*, *tia*, *ia*, *ĉia*, *nenia*, *kies*, *ties*, *ies*, *ĉies*, *nenies*. Oni do ne uzu *la* kune kun tiaj tabelvortoj.

#### *Ambaŭ*

La vorteto *ambaŭ* (§15.5) estas difinilo, kiam ĝi rekte priskribas O-vorton. Oni do ne uzu *la* kune kun *ambaŭ*.

### Aliaj difiniloj antaŭ propraj nomoj

Antaŭ normalaj propraj nomoj oni normale ne uzas *la* (§9.1.6). Aliaj difiniloj povas tamen aperi antaŭ ĉiaj propraj nomoj, sed nur malofte estas bezono de tiaj esprimoj:

- *Kaj vi ankaŭ,* ***mia Francisko****, vi ankaŭ?* [Rt.9] *Mia* aldonas ian amikecan nuancon.
- *Ĉu vi sentas teruron antaŭ* ***tiu Karolo****?* [Rt.33] *Tiu* emfazas, ke temas pri la ĵus menciita Karolo.
- ***Ambaŭ Pjotr Ivanoviĉ'oj*** *alkuras sur la pintoj de la piedoj.* [Rz.55] Temas pri du viroj kun la sama nomo.

## 9.3. Pli ol unu difinilo

Iafoje oni bezonas du difinilojn (§9) por montri la celitan sencon. Jen kelkaj ekzemploj:

- *El* ***ĉiuj miaj infanoj*** *Ernesto estas la plej juna.* [FE.10]
- *Pri* ***ĉiuj viaj tri demandoj*** *mi donis al vi nur mian personan opinion.* [LR.139]
- ***Ambaŭ ŝiaj brakoj*** *estis levitaj.* [FA1.154]
- *Mi vidis ĝin en la spegulo per* ***ĉi tiuj miaj propraj okuloj****.* [Rt.93]
- ***Ĉiuj tiuj konkludoj*** *prezentas produkton de la simpla kaj severa logiko.* [FK.296]
- *La infanoj ne povis sidi sur la seĝoj, ĉar* ***ĉiuj ties kruroj*** [la kruroj de la seĝoj] *estis rompitaj.*
- *La infano ne povis uzi la biciklon, ĉar* ***ambaŭ ties radoj*** *estis difektitaj.*

Ordinare en tiaj okazoj eventuala poseda difinilo (poseda pronomo aŭ tabelvorto je ES) aperas laste, do normale *ĉiuj iliaj* (malofte *iliaj ĉiuj*). Sed *kies* tamen ordinare aperas unue, se ĝi iafoje kuniras kun alia difinilo: *mi* [...] *gloras la Reĝon de la ĉielo,* ***kies ĉiuj faroj*** *estas veraj.* [Dn.4] (*Ĉiuj liaj faroj estas veraj.*)

Ofte oni uzas anstataŭe vortumon kun la rolvorteto *el* (§12.3.5.2): *ĉiuj el miaj infanoj*, *ĉiuj el viaj tri demandoj*, *ĉiuj el tiuj konkludoj*, *ĉiuj el ties kruroj* k.s.

Oni tamen ne uzu *la* (§9.1) kune kun alia difinilo: ne **la miaj amikoj**, sed *miaj amikoj*, ne **la ĉiuj homoj**, sed *ĉiuj homoj*. Sed *tiuj infanoj estas la*

*miaj* ja estas uzebla, ĉar tie *miaj* aperas sen O-vorto, kaj tial ne estas traktata kiel difinilo (§9.2).

# 10. Apostrofo

Apostrofo, ’, estas signeto, kiu montras, ke parto de vorto estas forlasita. En Esperanto temas normale ĉiam pri forlasita vokalo.

## 10.1. Normala apostrofado

### Apostrofado de O-finaĵo

La finaĵon O de O-vorto oni povas ellasi. Tiam oni skribas apostrofon anstataŭ O. Tia ellaso de O estas tamen ebla nur kiam ne sekvas iu el la finaĵoj J kaj N. En la parolo la akcento restas sur la sama vokalo, kvazaŭ la O ankoraŭ ĉeestus. La apostrofo estas kvazaŭ neelparolata vokalo:

- *turmento → turment’* (*turm**é**nt’*)
- *vespero → vesper’* (*vesp**é**r’*)
- *historio → histori’* (*histor**í**’*)
- *metroo → metro’* (*metr**ó**’*). Komparu kun *metro* (*m**é**tro*).
- *armeo → arme’* (*arm**é**’*). Komparu kun *arme* (*á**rme*).
- *revuo → revu’* (*rev**ú**’*). Komparu kun *revu* (*r**é**vu*).
- *ĉielo → ĉiel’* (*ĉi**é**l’*). Komparu kun *ĉiel* (*ĉ**í**el*).

Oni ne povas apostrofi A-vortojn. La apostrofita formo *ruĝ’* egalas ĉiam al *ruĝo*, neniam al *ruĝa*. Apostrofo ankaŭ ne povas anstataŭi verban finaĵon aŭ E-finaĵon (legu tamen ĉi-poste pri la esprimo *dank’ al*). Oni ankaŭ atentu, ke oni ne povas uzi apostrofon, kiam post O sekvas J aŭ N. La apostrofita formo *har’* egalas ĉiam al *haro*, neniam al *haron*, *haroj* aŭ *harojn*.

La tabelvortoj je O (§15.2) finiĝas per “o”, sed tiuj “o”-vokaloj ne estas veraj O-finaĵoj (§13.2), kaj oni ne povas ilin anstataŭigi per apostrofoj. Ne estas do ĝustaj **ki’**, **ti’**, **i’**, **ĉi’**, **neni’** anstataŭ *kio*, *tio*, *io*, *ĉio*, *nenio*. Nur en poezio oni iafoje tamen uzas tiajn nenormalajn formojn.

### Apostrofado de *la*

La vokalo “a” en la difina artikolo *la* (§9.1) povas esti ellasita kaj anstataŭigita per apostrofo → *l’*. Tiun mallongigitan formon oni prefere uzu nur post rolvortetoj, kiuj finiĝas per vokalo: *de l’*, *ĉe l’*, *je l’*, *tra l’*, *pri l’*, *pro l’*:

- *Liberigu nin Dio, de **l’** sovaĝaj Normandoj!* [FA4.27]

Normale oni skribas *l’* kiel apartan vorton (kun posta spaceto), sed oni ĉiam elparolas ĝin kune kun la antaŭa rolvorteto kiel unu vorton, kvazaŭ *“del”*, *“ĉel”* k.t.p.

Iafoje en poezio oni trovas *l’* ankaŭ sen tia rolvorteto: ***L’** espero, **l’** obstino kaj la pacienco* [FK.300] *Ŝi vidis ke **l’** sentoj plu restas.* Ĉiuokaze oni uzu la mallongigitan artikolon nur tie, kie ĝi estas elparolebla.

## Ĉefe en poezio

Apostrofoj estas uzataj precipe en poezio por eviti troajn vokalojn.

> *Post longa migrado sur dorna la **voj'***
> *Minacis nin ondoj de **l'** maro;*
> *Sed venkis ni ilin kaj velas kun **ĝoj'***
> *Al verda **haven'** de **l'** homaro.*
> *Post longa batalo, maldolĉa **turment'***
> *La stela standardo jam flirtas en **vent'**.*
>
> el *La Tagiĝo* de *Antoni Grabowski*

En ordinara lingvaĵo apostrofoj estas tre maloftaj. En parola lingvo apostrofado apenaŭ okazas entute.

### *Dank' al*

Apostrofo estas ankaŭ tradicie uzata en la esprimo *dank' al* = "pro la (favora) influo de, mal-malgraŭ". *Dank' al* aperas en ĉia lingvaĵo, ankaŭ en parola uzo:

- *Jes, **dank' al** Dio, ĉio estas en bona ordo.* [Rz.38]
- ***Dank' al** la lingvo ni tiel altiĝis super la bestoj.* [FK.229]
- ***Dank' al** nia konstanteco kaj laborado nia afero iom post iom fortiĝados.* [OV.123]
- ***Dank' al** la grandaj elspezoj* [...] *la monujo baldaŭ montris al li sian nudan fundon.* [OV.126] Ĉi tie *dank' al* estas ironia. Temas fakte pri malfavora influo.

Iuj opinias, ke *dank' al* estas erara, ĉar la apostrofo ne anstataŭas O-finaĵon, sed pli vere E-finaĵon. Malgraŭ tiu kritiko *dank' al* restas firma kaj utila parto de Esperanto. Oni povas trankvile pluuzi ĝin kiel fiksitan esprimon. Sed *danke al* ja estas tute bona alternativo: *danke al Dio*, *danke al la lingvo*. Ankaŭ *danke* + N-finaĵo estas ebla: ***Danke unu eraron** en la tempo de la presado, la Regularo akceptis tute alian formon ol mi pensis.* [OV.71]

Iuj asertas, ke ja temas pri O-finaĵo: *dank' al = danko (estu) al* (aŭ simile). Tia klarigo funkcias, sed nur lame, en plej multaj frazoj. Tiam oni devas imagi la esprimon kun *dank' al* kiel apartan mallongigitan frazon: *Danko estu al la lingvo: Ni tiel altiĝis super la bestoj.*

### *Un'*

Kiam oni kalkulas taktojn, ritmojn k.s., oni povas uzi mallongigitan apostrofan formon de la nombra vorteto *unu* (§23.1.1):

- ***Un'**! du! **un'**! du! – La soldatoj marŝis. = Unu! du!...*
- *"**Un'**, du, tri, kvar", li kalkulis laŭte. = Unu, du ...*

*Un'* estas oficiale permesata de la Akademio de Esperanto (*Aktoj de la Akademio II*, p. 39), sed *un'* povas aperi nur en memstara, kvazaŭ ekkria uzo, kiel en la ĉi-antaŭaj ekzemploj. Ĝi ne povas aperi en ordinaraj frazoj.

Ne diru ekz.: **Mi havas nur un' amikon.** Ĝusta estas nur: *Mi havas nur unu amikon.*

## 10.2. Nenormala apostrofado

### Gramatika apostrofado

Iafoje oni uzas apostrofojn en vortaroj aŭ en diskutoj pri gramatiko por montri, ke oni parolas pri nuraj vortoradikoj, aŭ por disigi la partojn de kunmetitaj vortoj. En tia uzado apostrofo ne egalas al O-finaĵo. Estas rekomendinde en tiaj okazoj ne uzi apostrofojn, sed aliformajn streketojn.

### Disiga apostrofado

Okaze oni uzas apostrofojn por disigi vortelementojn unuj de la aliaj, precipe kiam oni uzas ne-Esperantan vortelementon kun Esperantaj finaĵoj: *Ĉu vi konas **Waringhien'on**?* Tiaj apostrofoj aperas ĉe kelkaj hebrelingvaj vortoj en *la Biblio*: *bat'o*, *kab'o*, *kor'o*, *log'o*, *min'o* (mezurunuoj), *bek'o* (monero), *pur'o* (loto). Oni povas anstataŭe uzi dividostrekon: *Waringhien-on*, *kab-o*, *log-o*. Tio estas verŝajne preferinda.

En la komenca tempo oni uzis en tekstoj por komencantoj diversaspektajn streketojn por disigi la elementojn de vortoj: *ŝi est|as am|at|a de ĉiu|j* [FG.54]. Ofte oni uzis streketojn tre similajn al apostrofoj, sed tiaj streketoj ne estas apostrofoj. Vidu ekzemplojn en Gramatiko en la *Fundamento* (§40).

### Apostrofado de AŬ-vortoj

Okazis provoj apostrofi E-vortecajn vortetojn, kiuj finiĝas per "aŭ": *hodiaŭ* → **hodi'**, *anstataŭ* → **anstat'**, *apenaŭ* → **apen'**, k.t.p. Tia apostrofado estas neregula. Ĝi neniam enuziĝis, kaj nur en poezio ĝi eventuale povus esti akceptebla.

### Nezorga elparolo

Iafoje oni uzas apostrofojn por montri, ke parto de vorto estas neregule forlasita, ekz. por montri nezorgan elparoladon aŭ nenormalan lingvaĵon: *'stas* = *estas*, *s'joro* = *sinjoro*, *'avas* = *havas*.

### Sonimitoj

Kiam oni uzas nudan radikon kiel sonimiton aŭ ekkrion (§18.2), oni iafoje aldonas apostrofon: *Ho, **halt'**!* [H.8] Estas preferinde ne skribi apostrofon en tiaj okazoj, ĉar ne temas pri ellasita O-finaĵo.

### Forlaso de A-finaĵoj

Aperis la ideo, ke oni povus ellasi ankaŭ A-finaĵojn, sed ke oni tiam ne uzus apostrofon: *diligenta knabo* → **diligent knabo**, *sincera koro* → **sincer koro** (la ekzemploj estas de *K. Kalocsay* en "Lingvo Stilo Formo"). Forlaso de A-finaĵoj tamen tute ne estas ebla en Esperanto, ĉu kun apostrofo, ĉu sen apostrofo.

## Neuzo de apostrofo

Kelkaj poetoj eksperimente forlasas apostrofojn supozante, ke la leganto tamen komprenos, kie mankas O-finaĵoj. Jen ekzemplo:

> *ŝovas harojn*
> *el **okul*** [= okul']
> *de ŝlimo*
> *fingro skvama*
> *monstra **manipul*** [= manipul']
> *moko moko **mok*** [= mok']
> *sen fino*
>
> el sentitola poemo de *Baldur Ragnarsson*

Kelkfoje tia uzado konfuzas malsamajn vortojn: *ĉiel* konfuziĝus kun *ĉiel' (ĉielo)*, *kaj* kun *kaj' (kajo)*, *nun* kun *nun' (nuno)*, *unu* kun *unu' (unuo)*, *al* kun *al' (alo)*, *ĉar* kun *ĉar' (ĉaro)*, *krom* kun *krom' (kromo)*, *por* kun *por' (poro)*, *kaze* kun *kaze' (kazeo)* k.t.p. Oni do uzu apostrofojn laŭ la Fundamentaj reguloj.

# 11. Pronomoj

Pronomoj estas O-vortecaj vortetoj, kiujn oni uzas por paroli pri tute konataj aferoj. En *PMEG* nur dek vortetoj estas nomataj pronomoj. Iliaj bazaj formoj nomiĝas personaj pronomoj (§11.1), kvankam ili ne ĉiam montras personojn. Kun A-finaĵoj ili nomiĝas posedaj pronomoj (§11.2), kvankam ili ne ĉiam montras posedon.

Legu ankaŭ pri uzado de pronomoj en nerekta parolo en §33.8.3.

## 11.1. Personaj pronomoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| ***mi*** | ≈ | la parolanto | §11.3 |
| ***ni*** | ≈ | la parolanto kaj alia(j) persono(j) | §11.3 |
| ***vi*** | ≈ | la alparolato(j) | §11.4 |
| ***li*** | ≈ | la priparolata vira persono aŭ persono kun nekonata sekso | §11.5 |
| ***ŝi*** | ≈ | la priparolata ina persono | §11.5 |
| ***ĝi*** | ≈ | la priparolata aĵo, besto aŭ infaneto | §11.5 |
| ***ili*** | ≈ | la priparolataj personoj, aĵoj aŭ bestoj | §11.5 |
| ***oni*** | ≈ | neprecizigita(j) persono(j) | §11.5 |
| ***si*** | ≈ | la sama persono kiel la subjekto, se tiu ne estas *mi*, *ni* aŭ *vi* (aŭ *ci*) | §11.6 |

Teorie ekzistas ankaŭ la pronomo *ci* (§11.4) ≈ "la alparolato" (unu-nombra), sed *ci* normale ne estas uzata. Oni uzas *vi* kaj unu-nombre kaj multe-nombre.

Krome ekzistas la neoficiala (proponita) pronomo *ri* (§11.5) ≈ "la priparol-ata persono" (unu-nombra).

La personaj pronomoj povas ricevi la finaĵon N (§12.2): *Mi amas **vin**. **Ilin** konas Karlo. Ĉu vi **ĝin** vidas? Elizabeto lavas **sin** en la lago.*

## 11.2. Posedaj pronomoj

Se oni aldonas la finaĵon A al personaj pronomoj (§11.1), oni kreas **posedajn pronomojn**:

| | | |
|---|---|---|
| ***mia*** | (la)... de mi | §11.3 |
| ***nia*** | (la)... de ni | §11.3 |
| ***via*** | (la)... de vi | §11.4 |
| ***lia*** | (la)... de li | §11.5 |
| ***ŝia*** | (la)... de ŝi | §11.5 |
| ***ĝia*** | (la)... de ĝi | §11.5 |
| ***ilia*** | (la)... de ili | §11.5 |
| ***onia*** | (la)... de oni | §11.5 |
| ***sia*** | (la)... de si | §11.6 |

Teorie ekzistas ankaŭ *cia* (§11.4) = "(la)... de ci", sed *cia* normale ne estas uzata. Oni uzas *via* kaj unu-nombre kaj multe-nombre.

Krome ekzistas la neoficiala (proponita) poseda pronomo *ria* (§11.5) ≈ "(la)... de ri (de la persono)" (unu-nombra).

La posedaj pronomoj estas difiniloj (§9.2). Ili enhavas normale la signifon de *la*.

La posedaj pronomoj povas ricevi la finaĵojn J (§8) kaj N (§12.2) same kiel aliaj A-vortoj (ĉiam J antaŭ N): *mia ĉambro – miaj ĉambroj – mian ĉambron – miajn ĉambrojn*.

**Noto:** Iafoje oni renkontas posedajn pronomojn kun la fino *"es"* anstataŭ A: **mies**, **vies**, **lies**, **ilies** k.t.p. La "es"-parto estas pruntita de la tabelvortoj je ES (§15.4), kiuj ankaŭ estas posedaj. Tiaj posedaj pronomformoj estas neregulaj, sed tamen kompreneblaj. Kiel ŝercajn vortojn oni povus ilin eble iafoje uzi, sed en serioza uzo ili estas nepre evitendaj.

### Signifoj

Poseda pronomo similas al *de* + persona pronomo: *mia ≈ (la) de mi*. Sed *de* (§12.3.2) havas tre multajn signifojn. La posedaj pronomoj havas nur kelkajn el tiuj signifoj:

- La normala signifo de poseda pronomo estas aparteno aŭ posedo (§12.3.2.3): *mia domo* = "la domo posedata de mi, la domo kiu apartenas al mi", *lia nazo* = "la nazo kiu apartenas al li, la nazo kiu estas parto de li", *ŝia lernejo* = "la lernejo en kiu ŝi lernas/instruas (aŭ simile)", *ilia lingvo* = "la lingvo kiun ili parolas".
- Poseda pronomo povas ankaŭ montri aganton (§12.3.2.2): *lia agado* = "la agado (farata) de li, la agado kiun li faras". Poseda pronomo povas havi tian signifon nur ĉe aga O-vorto: *lia agado*, *iliaj klopodoj*, *via atingo*. *De* povas havi tian signifon ankaŭ ĉe pasiva participo: *farita de li*, *amata de mi*.
- Poseda pronomo povas kelkfoje montri sencan objekton (§12.3.2.2): *ĝia uzado* = "la uzado de ĝi, la ago uzi ĝin". Oni atentu, ke miskom-

prenoj ne ekestu. *Ŝia admirado* normale signifas: “la admirado fare de ŝi” (subjekta signifo). Se oni uzas *ŝia admirado* en la signifo “la ago admiri ŝin” (objekta signifo), oni ne eraras, sed oni eble riskas miskomprenon.

En iaj frazoj pri ies korpoparto, vestaĵo aŭ simile, oni kutimas uzi *al* (§12.3.5)-komplementon anstataŭ poseda pronomo: *Mi lavis **al mi** la manojn. = Mi lavis **miajn** manojn. Ili disŝirus **al si** la vestojn.* [FA2.88] *= Ili disŝirus **siajn** vestojn.*

## 11.3. Unua persono

### *Mi*

*Mi* estas unu-nombra (kaj tute ne montras sekson). *Mi* kaj *mia* estas uzataj de la parolanto por paroli pri si mem. En gramatiko tio estas ofte nomata “la unua persono”:

- ***Mi** venas de la avo, kaj **mi** iras nun al la onklo.* [FE.9]
- *Promenante sur la strato, **mi** falis.* [FE.22]
- *La patro donis al **mi** dolĉan pomon.* [FE.10]
- *Tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte aĉetata de **mi**.* [FE.25]
- ***Mi** amas **min** mem.* [FE.18]
- ***Mi** foriras, sed atendu **min**, ĉar **mi** baldaŭ revenos.* [FE.42]
- *Ho ve, sinjoro, **mia** patrino forpelis **min** el la domo.* [FE.21]
- *Por **miaj** kvar infanoj **mi** aĉetis dek du pomojn.* [FE.14]
- *Kiam **mi** finos **mian** laboron, **mi** serĉos **mian** horloĝon.* [FE.20]
- ***Mi** prenos **miajn** glitilojn kaj iros gliti.* [FE.34]

### *Ni*

*Ni* estas multe-nombra (kaj tute ne montras sekson). *Ni* kaj *nia* estas uzataj de la parolanto por paroli pri si mem kaj alia(j) persono(j). *Ni* povas signifi *mi kaj unu alia persono*, *mi kaj pluraj aliaj personoj*, *mi kaj ĉiuj aliaj personoj*, aŭ *mi kaj vi*. La pronomo *ni* jen inkluzivas la alparolata(j)n homo(j)n, jen ne. Kiuj personoj estas inkluzivataj, povas montri nur la kunteksto:

- ***Ni** vidas per la okuloj kaj aŭdas per la oreloj.* [FE.9] *Ni* = “mi kaj ĉiuj aliaj homoj”.
- ***Ni** disiĝis kaj iris en diversajn flankojn: mi iris dekstren, kaj li iris maldekstren.* [FE.28] *Ni* = “mi kaj li”.
- *Kiam vi ekparolis, **ni** atendis aŭdi ion novan, sed baldaŭ **ni** vidis, ke **ni** trompiĝis.* [FE.40] *Ni* = “mi kaj aliaj personoj, sed ne la alparolato”.
- *Neniam aliaj povas fariĝi pli feliĉaj, ol **ni** ambaŭ!* [FA2.32] *Ni* = “mi kaj vi”.
- ***Ni** du laboris alterne.* [FA3.122] *Ni* = “mi kaj unu alia”.
- *Kiam vi vidis **nin** en la salono, li jam antaŭe diris al mi la veron.* [FE.24] *Ni* = “mi kaj li”.

- *La nokto estis tiel malluma, ke **ni** nenion povis vidi eĉ antaŭ **nia** nazo.* [FE.33]
- *La junulo aliĝis al **nia** militistaro kaj kuraĝe batalis kune kun **ni** kontraŭ **niaj** malamikoj.* [FE.39]

Legu ankaŭ pri *ni* en nerekta parolo en §33.8.3.

Iafoje *ni* estas uzata pri unu persono. Tio okazas en iaj stiloj de skriba lingvo, kiam la skribanto volas iel ŝajnigi, ke li tamen ne estas sola, ĉu pro modesteco, ĉu pro alia kialo:

- *La montritajn naŭ vortojn **ni** konsilas bone ellerni.* [FE.30] *Ni* ĉi tie fakte estas nur Zamenhof: unu persono. Li uzis *ni* por kvazaŭ inkluzivigi ankaŭ aliajn esperantistojn.
- *En la venonta ĉapitro **ni** traktos tiun ĉi demandon pli profunde.* Per *ni* la aŭtoro kvazaŭ inkluzivigas la leganton.

En iuj tempoj kaj kulturoj reĝo aŭ alia altrangulo iafoje priparolis sin mem per *ni* anstataŭ *mi*, por montri sian altan rangon. En Esperanto tia uzo de *ni* povas aperi en literaturo, precipe en tradukoj. Tiam estas ofte konsilinde aldoni klarigan noton.

## 11.4. Dua persono

### *Vi*

*Vi* kaj *via* estas uzataj de la parolanto por paroli pri la persono(j), al kiu(j) li parolas. *Vi* kaj *via* povas inkluzivi ankaŭ aliajn personojn, kiuj iel apartenas al la sama grupo kiel la alparolato(j). En gramatiko tio estas nomata "la dua persono". Oni uzas *vi* egale al unu aŭ pluraj personoj. *Vi* estas do jen unu-nombra, jen multe-nombra. (Estus tute malĝuste diri, ke *vi* estas multe-nombra pronomo uzata ankaŭ unu-nombre. *Vi* estas dekomence sendistinge ĉu unu-nombra, ĉu multe-nombra. Estas tial absolute nenia mallogikeco en la uzado de *vi* por unu persono.) *Vi* tute ne montras sekson, kaj estas ankaŭ tute neŭtrala pri rango aŭ pozicio k.t.p.:

- *Sinjoro, **vi** estas neĝentila.* [FE.16]
- *Sinjoroj, **vi** estas neĝentilaj.* [FE.16]
- ***Vi** estas infanoj.* [FE.16]
- *Mia hundo, **vi** estas tre fidela.* [FE.16] Oni parolas al hundo kvazaŭ al persono.
- *Vi amas **vin** mem.* [FE.18]
- *Sidigu **vin*** [...], *sinjoro!* [FE.39]
- *Mi rakontos al **vi** historion.* [FE.18]
- *Mi deziras al **vi** bonan tagon, sinjoro!* [FE.10]
- *Unue mi redonas al **vi** la monon, kiun **vi** pruntis al mi; due mi dankas **vin** por la prunto; trie mi petas **vin** ankaŭ poste prunti al mi, kiam mi bezonos monon.* [FE.14]
- *Ĉu **vi** amas **vian** patron?* [FE.41]

- ***Via** parolo estas tute nekomprenebla kaj **viaj** leteroj estas ĉiam skribitaj tute nelegeble.* [FE.41]

Kiam la pronomo *vi* estas subjekto de U-verbo en ĉeffrazo, oni plej ofte forlasas ĝin (§32.3).

En kelkaj lingvoj oni iafoje uzas *vi*-pronomon pri personoj ĝenerale. Por tio oni uzas en Esperanto la pronomon *oni* (§11.5).

### *Ci*

*Ci* estas unu-nombra alparola pronomo (kiu tute ne montras sekson). *Ci* kaj *cia* ekzistas nur teorie, kaj estas preskaŭ neniam praktike uzataj. Oni povus imagi *ci* kiel pure unu-nombran *vi*, aŭ kiel intiman familiaran (unu-nombran) *vi*, aŭ eĉ kiel insultan (unu-nombran) *vi*. Sed estas fakte tute neeble diri, kian nuancon ĝi montras, ĉar ĝi apenaŭ estas uzata:

- ***Ci** skribas (anstataŭ "**ci**" oni uzas ordinare "vi").* [FE.16] Tio ĉi estas la sola frazo kun *ci* en la *Ekzercaro* de la *Fundamento de Esperanto*. Krome *ci* kaj *cia* estas menciitaj en la *Universala Vortaro* de la *Fundamento*, sed en la *Fundamenta Gramatiko* ("la 16 reguloj") aperas nek *ci* nek *cia*. Ankaŭ en la *Unua Libro* ili ne troviĝas.

Iuj pensas, ke oni antaŭe uzis *ci* en Esperanto, kaj ke tiu uzo poste malaperis. La vero estas, ke *ci* neniam vere estis praktike uzata. Ĝi nur aperis iafoje en eksperimenta lingvaĵo kaj en iuj malvastaj rondoj, kiuj praktikis neordinaran lingvaĵon. Origine oni ĉiam uzadis nur *vi*, kaj tiel estas plu en normala Esperanto.

Kelkfoje oni trovas *ci* en tradukoj, kie la originalo havas *ci*-similan pronomon. Tio plej ofte estas netaŭga tradukomaniero, ĉar *ci* apenaŭ kapablas redoni la sencon de ofte uzata normala vorto, kiam ĝi mem estas maloftega vorto, kies signifonuanco ne estas klare fiksita. Por montri ekz. nuancon de familiareco aŭ insultan sencon, oni uzu je bezono aliajn lingvajn rimedojn:

- *"Jes, jes!" diris la reĝo, "lunde **ci** ricevos nian filinon!" ĉar nun, kiel al estonta bofilo, li parolis al li "**ci**".* [FA1.203] En la originala teksto aperis *ci*-simila pronomo, kiu montris intiman, familiaran rilaton. Oni povus alternative traduki ekz. jene: *"Jes, jes!" diris la reĝo, "lunde, kara filo, vi ricevos nian filinon!", ĉar nun, kiel estontan bofilon, li nomis lin "filo".*

Tre multaj esperantistoj ne komprenas la pronomon *ci*. Tial tiuj, kiuj provas uzi *ci* en interparolado, renkontas multajn malfacilaĵojn. En normala Esperanto oni simple uzas ĉiam *vi*, ĉu oni parolas al unu persono, ĉu al pluraj, ĉu oni parolas al intime konata persono, ĉu al fremdulo, ĉu oni parolas al amiko, ĉu al malamiko. Tio funkcias tre bone. Je bezono oni povas pliprecizigi per *vi sinjoro*, *vi amiko*, *vi kara*, *vi ĉiuj*, *vi amikoj*, *vi karaj*, *vi ambaŭ* k.t.p.

La kunmetaĵo *ci-diri* (aŭ *cii*) povas iafoje montri uzadon de *ci*-simila pronomo en alilingva interparolo: *– Kial ŝi ofendiĝis? Mi ne komprenas ilian lingvon. – Mi pensas, ke li **ci-diris** al ŝi, kaj tion ŝi ne permesas.*

## 11.5. Tria persono

En gramatiko ĉio, kio ne estas *mi*, *ni* aŭ *vi* (aŭ *ci*), estas nomata "la tria persono". *Li*, *ŝi*, *ĝi* kaj *ili*, kaj *lia*, *ŝia*, *ĝia*, *ilia*, estas uzataj por paroli pri io konata, kio estas nek la parolanto, nek la alparolato. *Oni* kaj *onia* estas uzataj por paroli pri nedifinita(j) persono(j). *Si* kaj *sia* (§11.6) anstataŭas la aliajn triapersonajn pronomojn en certaj okazoj. Krome ekzistas ankaŭ la neoficialaj triapersonaj pronomoj *ri* kaj *ria*.

### *Li* kaj *ŝi*

*Li* kaj *ŝi* estas unu-nombraj. *Li* kaj *lia* estas uzataj, kiam oni parolas pri unu vira persono. *Ŝi* kaj *ŝia* estas uzataj pri unu ina persono:

- ***Li** estas knabo, kaj **ŝi** estas knabino.* [FE.16]
- *Mi vokas la knabon, kaj **li** venas.* [FE.16]
- *Mi vokas la knabinon, kaj **ŝi** venas.* [FE.16]
- ***Li** estas mia onklo.* [FE.18]
- ***Ŝi** estas mia onklino.*
- ***Li** ne estas lavisto, **li** estas lavistinedzo.* [FE.36]
- ***Ŝi** estas lavistino.*
- ***Li** fianĉiĝis kun fraŭlino Berto.* [FE.39]
- ***Ŝi** fianĉiniĝis.*
- *Ĉu vi amas vian patron? Kia demando! kompreneble, ke mi **lin** amas.* [FE.41]
- ***Ŝiaj** gepatroj volis **ŝin** edzinigi kun alia persono.* [FE.39]
- *En la salono estis neniu krom **li** kaj **lia** fianĉino.* [FE.26]
- ***Liaj** lipharoj estas pli grizaj, ol **liaj** vangharoj.* [FE.31]
- *"Jes, patrino", respondis al **ŝi** la malĝentilulino.* [FE.21] *Ŝi* = la patrino.
- ***Lia** edzino estas tre laborema kaj ŝparema, sed **ŝi** estas ankaŭ tre babilema kaj kriema.* [FE.41]
- ***Li** amas tiun ĉi knabinon pro **ŝia** beleco kaj boneco.* [FE.35]
- *Mi renkontis vian patrinon kaj **ŝian** kolegon.*
- *Mi bone konas vian fraton kaj **liajn** amikojn.*
- *En unu tago, kiam **ŝi** estis apud tiu fonto, venis al **ŝi** malriĉa virino, kiu petis **ŝin**, ke **ŝi** donu al **ŝi** trinki.* [FE.15] La frazo enhavas du inajn personojn, knabinon kaj virinon. Ĉiuj *ŝi* estas la knabino, krom la lasta, kiu estas la virino.
- *Apenaŭ **ŝia** patrino **ŝin** rimarkis, **ŝi*** [= la patrino] *kriis al **ŝi*** [= la filino]*: "Nu, mia filino?"* [FE.21]

Kiam oni parolas pri persono, kies sekso ne estas konata, aŭ kiam oni parolas ĝenerale pri persono de iu ajn sekso, oni tradicie uzas *li*:

- *Ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke **li** vidas la patrinon.* [FE.11] *Li* respondas ĉi tie al *ĉiu*, do al *ĉiu persono*.

- *Ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al **li**.* [FE.13]
- *Ni povas diri "pardoni al la malamiko" kaj "pardoni la malamikon", sed ni devas diri ĉiam "pardoni al la malamiko **lian** kulpon".* [FE.29] *Li = la malamiko*. La frazo temas pri teoria persono, ĉu vira, ĉu virina.

Tia ĉi uzo de *li* povas esti rigardata kiel seksa diskriminacio. Efektive en tradicia uzo *li* estas dusignifa: vira kaj sekse neŭtrala, sed multaj opinias, ke tia uzo ignoras virinojn aŭ prezentas virecon kiel normalan kaj virinecon kiel esceptan. Krome tiu dusignifeco ja povas iafoje kaŭzi malklaraĵojn. Tiam oni povas esprimi sin pli klare per ekz. *ŝi aŭ li*, *tiu*, *tiu persono* k.s. Sed tia uzo tamen povas esti maloportuna, kaj tial aperis diversaj proponoj de nova sekse neŭtrala pronomo por homo. La sola tia propono, kiu efektive estas uzata, estas *ri*° (vidu ĉi-poste). Tiu nova vorto tamen ne estas parto de la oficiala kaj normala Esperanto, kaj ne ĉiuj esperantistoj konas ĝin. Aliaj uzas *ĝi* tiusence, do ankaŭ por homo.

### *Ĝi*

*Ĝi* estas unu-nombra. *Ĝi* kaj *ĝia* estas uzataj por paroli pri aĵo (konkreta aŭ abstrakta). *Ĝi* ne montras sekson:

- *La tranĉilo tranĉas bone, ĉar **ĝi** estas akra.* [FE.16]
- *Ĉu vi jam trovis vian horloĝon? – Mi **ĝin** ankoraŭ ne serĉis.* [FE.20]
- *Kiam malriĉa virino petos de vi trinki, vi donos **ĝin** al ŝi ĝentile.* [FE.17] *Ĝin = la petitan trinkaĵon*.
- *Li donis al mi monon, sed mi **ĝin** tuj redonis al li.* [FE.42]
- *Mi disŝiris la leteron kaj disĵetis **ĝiajn** pecetojn en ĉiujn angulojn de la ĉambro.* [FE.42]
- *Tiam oni ekkantis sanktan kanton, kaj **ĝi** sonis tiel bele, ke ĉe Johano aperis larmoj en la okuloj.* [FA1.60]
- *Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas la lingvon Esperanto, tute egale, por kiaj celoj li **ĝin** uzas.* [OV.371]
- *Ni rigardu, kio fariĝis al la korpo de la gardisto. Senvive **ĝi** sidis sur la ŝtuparo.* [FA1.127] Kiam oni parolas pri la gardisto kiel persono, oni uzu *li*, sed kiam oni parolas nur pri lia korpo (vivanta aŭ mortinta), oni uzu *ĝi*.

Oni uzas *ĝi* ankaŭ pri infaneto, kiu estas tiel juna, ke la sekso ne gravas. Sed oni povas ankaŭ uzi *li*, kiel oni faras por persono, kies sekson oni ne scias:

- *La infano ploras, ĉar **ĝi** volas manĝi.* [FE.16]
- *Mi montris al la infano, kie kuŝas **ĝia** pupo.* [FE.18]

Sed se oni volas aparte montri la sekson de infaneto, aŭ se oni parolas pri pli aĝa infano, oni kompreneble uzu *li* aŭ *ŝi*.

*Ĝi* estas uzata ankaŭ por paroli pri besto, eĉ kiam ĝia sekso estas konata:

- *El sub la kanapo la muso kuris sub la liton, kaj nun **ĝi** kuras sub la lito.* [FE.26]
- *La birdo ne forflugis: **ĝi** nur deflugis de la arbo.* [FE.31]
- *Mi frapos vian ĉevalon sur la kapon tiel, ke **ĝi** falos senviva.* [FA1.14]

- *Nia maljuna amiko renkontiĝis kun kamparano, kiu pelis bovinon, bovinon tiel ĉarman, kiel bovino nur povas esti. "**Ĝi** certe donas belan lakton!" li pensis.* FA4.230

Se temas pri hejmbesto aŭ alia besto, al kiu oni havas personan rilaton, multaj preferas uzi *li* aŭ *ŝi* anstataŭ *ĝi*. Ankaŭ en aliaj okazoj, kiam *ĝi* povas kaŭzi miskomprenon, oni povas uzi *li* aŭ *ŝi* pri besto. En fabeloj, kie bestoj rolas kiel personoj, estas ofte pli nature uzi *li* aŭ *ŝi*, sed ankaŭ *ĝi* estas ebla:

- *Tiu katino estas mia plej bona amiko. **Ŝi** eĉ dormas en mia lito.*
- *Melku bovon senfine, **li** lakton ne donos.* PE.197 Ĉi tie la pronomo *li* montras, ke oni parolas pri virseksa bovo. Oni ankaŭ povas uzi *ĝi*, sed tio povas kaŭzi nekomprenon, ĉar la vorto *bovo* ne estas per si mem nepre virseksa (§4.3). Alia eblo estas uzi *virbovo* anstataŭ *bovo*.
- *Klinu la kolon antaŭ la maljuna anasino tie. **Ŝi** estas ĉi tie la plej eminenta el ĉiuj.* FA2.36 El fabelo, en kiu birdoj rolas kiel personoj.

En fabelo oni povas uzi *li* aŭ *ŝi* eĉ pri nevivanta afero, se ĝi rolas kiel persono, kaj oni volas ĝin prezenti kiel viran aŭ virinan:

- *La historion de tiu kolumo ni nun aŭdu. **Li** ĵus atingis la edziĝotaŭgan aĝon, kiam **li** okaze trafis en lavotan tolaĵon kune kun ŝtrumpa rubando.* FA3.6 Kolumo rolas viran rolon en fabelo.

*Ĝi* ankaŭ povas reprezenti unu-nombrajn grupvortojn kiel: *familio*, *popolo*, *armeo* k.s., kvankam temas pri personoj. Iafoje oni tamen uzas *ili* (vidu ĉiposte):

- *Hodiaŭ la problemo interesas la publikon, morgaŭ **ĝi** povas esti indiferenta pri ĝi.* La unua *ĝi* reprezentas la publikon, plurajn personojn. (La dua *ĝi* estas la problemo.)

En iaj specialaj kuntekstoj oni parolas pri io, kio povas egale esti aĵo aŭ vivulo, besto aŭ homo. Tiam oni uzas *ĝi* eĉ se la priparolata afero principe povas esti homo:

- *Mamulo naskas idojn, kiujn **ĝi** nutras per lakto.* Ankaŭ homo estas mamulo, sed tamen oni uzas *ĝi*, ĉar en tiu ĉi kunteksto ankaŭ homo estas rigardata kiel besto.
- *Arĥimedo diris, ke korpo estas en sia natura stato kiam **ĝi** estas senmova.* Ĉi tie *korpo* fakte estas ĉia ajn materia objekto. La ideo de Arĥimedo validas kompreneble ankaŭ por homa korpo, sed en tiu ĉi kunteksto oni rigardas homon kiel aĵon, nuran korpon, ne kiel personon.

*Ĝi* normale reprezentas aĵon, beston kaj alian klare difinitan aferon, kiun oni povas esprimi per O-vorta frazeto (*la aĵo*, *la granda besto*, *tiu laŭta sono*, *lia subita amo*...). Sed se oni parolas pri io abstrakta, kio estas redonebla nur per tuta frazo, oni normale uzas anstataŭe *tio*: *Li diris al mi sekreton, sed mi forgesis **ĝin*** (= la sekreton). *Li diris al mi, kie li kaŝis la trezoron, sed mi forgesis **tion*** (= kie li kaŝis la trezoron). Sed Zamenhof en tiaj okazoj tamen ofte uzis *ĝi*:

- *"<u>Mi estis apud ŝi</u>!" "Jes, mi **ĝin** scias."* BV.83 = *Jes, mi scias, ke vi estis apud ŝi.* Oni prefere diru: *Jes, mi tion scias.*

- *Ĉu vi, kara Mario, trovas **ĝin** konvena, ke juna virino* [...] *restu la tutan tagon ĉe la sama tablo kun kelke da junaj viroj?* [M.88] *Ĝin* estas duoblaĵo de la vera objekto, la subfrazo, por helpi al la frazokonstruo. Oni povas tute forigi *ĝin*: *... trovas konvene, ke juna virino restu ...* Sed oni povas ankaŭ uzi helpan *tio* (§33.2.1): *... trovas tion konvena, ke juna virino restu ...*
- *En la ĉambro estis tri personoj, el kiuj unu leviĝis renkonte al Marta. **Ĝi** estis virino de meza aĝo.* [M.20] Nun oni preferas: *Tio estis virino de meza aĝo.* Aŭ: *Ŝi estis virino de meza aĝo.*

Zamenhof iafoje uzis *ĝi* kiel superfluan duoblaĵon de subjekto aŭ objekto, kiam la vera subjekto aŭ objekto estis I-verbo. Li ankaŭ uzis iafoje *ĝi* kiel superfluan duoblaĵon de subjekto de *esti*, kiam la vera subjekto staris post *esti*. Tiu uzo komplete malaperis, kaj estas nuntempe rigardata kiel eraro:

- *Por mi **ĝi** estis la plej kora ĝojo <u>inciti la hundon</u>.* [Rt.19] *Ĝi* rolas kiel subjekto, sed la vera subjekto estas *inciti la hundon*. Oni forlasu *ĝi*.
- ***Ĝi** estis <u>varmega posttagmezo</u>.* [Rt.83] La vera subjekto estas *varmega posttagmezo*. Oni forlasu *ĝi*.

En kelkaj lingvoj oni iafoje uzas pronomon similan al *ĝi* kiel malplenan subjekton, kiu reprezentas nenion ajn. La koncernaj verboj vere estas sensubjektaj. En Esperanto oni ne uzu *ĝi* ĉe tiaj sensubjektaj verboj (§30.1): *Hodiaŭ pluvas. Estos varme tie.*

Ekde la 2010-aj jaroj iuj provas sisteme uzi *ĝi* kaj *ĝia* kiel sekse neŭtralajn pronomojn por homo, do ne nur por infaneto. Tion oni povas nomi "ĝiismo". Kelkaj tiel uzas *ĝi* nur por paroli ĝenerale pri persono, do anstataŭ la tradicia uzo de *li*: *Se iu alvenos frue, diru al **ĝi**, ke **ĝi** atendu, ĝis mi alvenos.* Iafoje oni proponas uzi *ĝi* aparte por paroli pri neduumaj personoj (nek viraj nek inaj, aŭ sekse ambiguaj). Krome kelkaj tute radikale uzas ĉiam nur *ĝi* pri ĉiu ajn persono, tute forlasante la pronomojn *li* kaj *ŝi*. Ĝiismo forigas la tradician distingon inter ne-infanetaj homoj kaj aĵoj, kaj estas tial sufiĉe drasta ŝanĝo de la ĝisnunaj lingvaj kutimoj en Esperanto. Ĝiismo povas impresi kiel objektiga kaj ofenda. Aparte ofenda tia uzo povas esti, se oni uzas *ĝi* pri neduuma homo tamen plu uzante *li* kaj *ŝi* por viraj kaj inaj personoj. Vidu ankaŭ *ri* kaj *ria*.

**Noto:** Ĝiismo havas subtenon en du Lingvaj Respondoj de Zamenhof (*Lingvaj Respondoj* p. 78, n-ro 90 kaj n-ro 91). La praktika uzo tamen tute ne sekvis tiujn respondojn, sed rezervis la uzon de *ĝi* al bestoj kaj aĵoj laŭ la *Fundamenta Gramatiko* (§40), kaj al (malgrandaj) infanoj laŭ ekzemploj en la *Fundamenta Ekzercaro*.

### *Ili*

*Ili* estas multe-nombra. *Ili* kaj *ilia* estas uzataj por paroli pri pluraj konataj aferoj aŭ personoj (kiuj inkluzivas nek la parolanton, nek la alparolaton). *Ili* ne montras sekson:

- *Kie estas la knaboj? – **Ili** estas en la ĝardeno.* [FE.16]
- *Kie estas la knabinoj? – **Ili** ankaŭ estas en la ĝardeno.* [FE.16]
- *Kie estas la tranĉiloj? – **Ili** kuŝas sur la tablo.* [FE.16]
- *Donu al la birdoj akvon, ĉar **ili** volas trinki.* [FE.9]

- *Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam **ili** ne ĉiam estas faritaj el tolo.* FE.35
- *Kvinope **ili** sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn.* FE.14
- ***Ili** ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun **ili**.* FE.11
- *Sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn; mi ankaŭ tre amas **iliajn** (infanojn).* FE.18
- *Johanon, Nikolaon, Erneston, Vilhelmon, Marion, Klaron kaj Sofion **iliaj** gepatroj nomas Johanĉjo* [...], *Nikolĉjo* [...], *Erneĉjo* [...], *Vilhelĉjo* [...], *Manjo* [...], *Klanjo kaj Sonjo* [...]. FE.38

En kelkaj lingvoj oni iafoje uzas *ili*-pronomon pri nedifinitaj personoj. En Esperanto oni devas tiam uzi *oni*.

### *Oni*

*Oni* kaj *onia* estas nedifinitaj pronomoj, kiuj estas uzataj, kiam oni parolas pri ĉia ajn persono, multaj aŭ kelkaj nedifinitaj personoj, k.s. *Oni* estas normale unu-nombra, sed povas ankaŭ esti multe-nombra. *Oni* tute ne montras sekson:

- *En malbona vetero **oni** povas facile malvarmumi.* FE.42
- *Kiam **oni** estas riĉa (aŭ riĉaj), **oni** havas multajn amikojn.* FE.16
- ***Oni** diras, ke la vero ĉiam venkas.* FE.16
- *Ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke **oni** ne povis vivi kun ili.* FE.11
- *Lernolibron **oni** devas ne tralegi, sed tralerni.* FE.31
- *Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun **oni** uzas por vino.* FE.31
- *Post infekta malsano **oni** ofte bruligas la vestojn de la malsanulo.* FE.39
- *La domo, en kiu **oni** lernas, estas lernejo, kaj la domo, en kiu **oni** preĝas, estas preĝejo.* FE.40

Normale *oni* montras ĉiun ajn personon, sed iafoje ĝi montras certajn personojn, kiujn oni ne povas aŭ volas precizigi:

- *Kun bruo **oni** malfermis la pordegon, kaj la kaleŝo enveturis en la korton.* FE.38 Tute ne estas grave, kiuj personoj malfermis.
- ***Oni** tiel malhelpis al mi, ke mi malbonigis mian tutan laboron.* FE.33 La parolanto ne volas precizigi, kiuj malhelpis al li.
- ***Oni** alportas la tagmanĝon.* Rz.26 Nur la tagmanĝo estas interesa, ne la portanto.

La formoj *onin* kaj *onia* estas tre malofte uzeblaj en la praktiko. Pro ilia maloftegeco, kelkaj sentas ilin kiel strangajn, kaj evitas ilin. Zamenhof mem ne uzis ilin, sed skribis, ke ili estas tute regulaj (*Lingvaj Respondoj* p. 88, n-ro 106). Je bezono oni ne hezitu uzi ilin:

- *La malpura aero malsanigas **onin**.*

- *Kiam oni venas al tiu urbo, oni devas atenti pri la krimuloj. Ili kapablas ŝteli eĉ **oniajn** vestaĵojn.*
- *Ne kritiku **onin**, ĉar oni povas ankaŭ vin kritiki.*

En iuj lingvoj, ekz. la angla, pronomo, kiu ordinare signifas *vi*, estas iafoje uzata ankaŭ por esprimi sencon similan al tiu de *oni*. En Esperanto oni povas uzi *vi* en tia maniero, nur se la celita ideo vere inkluzivas la alparolatan personon, t.e. se la senco estas "vi kaj aliaj personoj en simila situacio": *En ĉiu lingvo **vi** trovos multe da substantivoj, kiuj ne havas tiun aŭ alian sekson, tiun aŭ alian kazon.* [FK.277] ≈ *En ĉiu lingvo **oni** trovos* ... Sed se la alparolato mem certe ne estas inkluzivita, oni kompreneble ne uzu *vi*: *Kiam **oni** stiras aŭton, **oni** devas esti atenta.* Se oni diras tion al blindulo, kiu ne rajtas stiri aŭton, estus absurde uzi *vi* anstataŭ *oni*.

En iuj lingvoj, ekz. la franca, *oni*-pronomo povas esti uzata kun la signifo "ni". Tio ne estas ebla en Esperanto: *– Kiel vi fartas, amikoj? – Nu, *oni* sufiĉe bone vivas!* Diru: *... ni sufiĉe bone vivas.*

#### *Ri°*

*Ri* kaj *ria* estas neoficialaj (proponitaj) pronomoj, kiujn iuj uzas (anstataŭ *li*, *lia*, *ŝi* kaj *ŝia*) por paroli pri unu persono sendepende de ties sekso:

- *Se iu alvenos frue, diru al **ri**, ke **ri** atendu, ĝis mi alvenos.*
- *Ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al **ri**.*
- *Iu postlasis valizon, en kiu estas **riaj** ŝlosiloj.*
- *Alekso kaj **ria** amiko estas ambaŭ neduumaj.* (Neduuma = nek viro, nek virino, aŭ sekse ambigua.)

Kelkaj uzas *ri* nur por paroli pri persono de nekonata sekso, aŭ por paroli ĝenerale pri persono de iu ajn sekso, do ĝuste en tiuj situacioj, en kiuj oni tradicie uzas *li* kun sekse neŭtrala senco. Aliaj uzas *ri* nur kiam ili parolas pri neduuma persono. Ankoraŭ aliaj tute radikale uzas ĉiam nur *ri*, kiam ili parolas pri persono, tute forlasante la pronomojn *li* kaj *ŝi*.

*Ri* kaj *ria* estas neoficialaj vortoj, kaj ne ĉiuj esperantistoj konas ilin. "Riismo" estas tamen jam sufiĉe disvastiĝinta, precipe inter junuloj, kaj multaj, kiuj mem neniam uzas *ri* aŭ *ria*, tamen komprenas la novajn vortojn. Aliflanke iuj forte kontraŭas la novajn pronomojn, opiniante, ke tia uzo estas neakceptebla reformo de la lingvo. La pronomon *ri* proponis plurfoje diversaj homoj sendepende. La unua propono kredeble okazis jam en 1976, sed notinda praktika uzo estas konstatebla nur post la jaro 2000.

### 11.6. *Si*

*Si* kaj *sia* estas specialaj triapersonaj pronomoj, kiujn oni en certaj okazoj devas uzi anstataŭ la ordinaraj pronomoj de la tria persono. *Si* estas jen unu-nombra, jen multe-nombra, depende de tio, kion ĝi reprezentas. *Si* per si mem ne montras sekson.

En simplaj frazoj (§11.6.1) la reguloj estas tute klaraj, sed en iaj kompleksaj frazoj (§11.6.2) la uzado ne estas fiksita.

### 11.6.1. *Si* en simplaj frazoj

Ofte okazas, ke tio, kio rolas kiel subjekto, aperas ankaŭ en alia rolo en la sama frazo. Se la subjekto estas *mi*, *ni* aŭ *vi* (aŭ *ci*), oni simple ripetas la saman pronomon:

- *Mi lavas* ***min***. La du *mi* estas la sama persono.
- *Mi vidas* ***mian*** *fraton*. *Mi* kaj *mia* montras la saman personon.
- *Ni lavas* ***nin***. La du *ni* estas la samaj personoj.
- *Ni vidas* ***niajn*** *fratojn*. *Ni* kaj *nia* montras la samajn personojn.
- *Vi lavas* ***vin***. La du *vi* estas la sama(j) persono(j).
- *Vi vidas* ***viajn*** *fratojn*. *Vi* kaj *via* montras la sama(j)n persono(j)n.

Sed se la subjekto estas triapersona (nek la parolanto, nek la alparolato), oni devas uzi *si* por la alia rolo. Se oni uzas ekz. *li* kaj subjekte, kaj en alia rolo, tiam temas nepre pri du malsamaj viroj. La samo validas por *ŝi*, *ĝi* kaj *ili*:

- *Ŝi lavas ŝin*. Unu virino lavas alian virinon.
- *Ŝi lavas* ***sin***. Unu virino lavas la propran korpon. *Ŝi* kaj *sin* montras la saman personon.
- *Ŝi vidas ŝian patrinon*. Unu virino vidas la patrinon de alia virino.
- *Ŝi vidas* ***sian*** *patrinon*. Unu virino vidas la propran patrinon.
- *La virino serĉas ŝian filon*. La virino serĉas la filon de alia virino.
- *La virino serĉas* ***sian*** *filon*. La virino serĉas la propran filon.
- *Li lavas lin*. Unu viro lavas alian viron.
- *Li lavas* ***sin***. Unu viro lavas la propran korpon. *Li* kaj *sin* montras la saman personon.
- *Li vidas lian patrinon*. Unu viro vidas la patrinon de alia viro.
- *Li vidas* ***sian*** *patrinon*. Unu viro vidas la propran patrinon.
- *La viro vundis* ***sin***. La viro vundis la propran korpon.
- *Ĝi lavas ĝin*. Unu besto lavas alian beston (aŭ aĵon).
- *Ĝi lavas* ***sin***. Unu besto lavas la propran korpon. *Ĝi* kaj *sin* montras la saman beston.
- *Ĝi vidas ĝian patrinon*. Unu besto vidas la patrinon de alia besto.
- *Ĝi vidas* ***sian*** *patrinon*. Unu besto vidas la propran patrinon.
- *La hundo ludas per* ***sia*** *pilko*. La hundo ludas per la propra pilko.
- *Ili lavas ilin*. Unu grupo de personoj aŭ bestoj lavas alian grupon.
- *Ili lavas* ***sin***. Unu grupo lavas la proprajn korpojn. *Ili* kaj *sin* montras la saman grupon.
- *Ili vidas ilian patrinon*. Unu grupo vidas la patrinon de alia grupo.
- *Ili vidas* ***sian*** *patrinon*. Unu grupo vidas la propran patrinon.
- *La naĝintoj ne trovas* ***siajn*** *vestaĵojn*. La naĝintoj ne trovas la proprajn vestaĵojn.

- *Karlo lavas lin.* Karlo lavas alian viron.
- *<u>Karlo</u> lavas **sin**.* Karlo lavas la propran korpon.
- *Karlo lavas lian infanon.* La infano apartenas al alia viro ol Karlo.
- *<u>Karlo</u> lavas **sian** infanon.* La infano apartenas al Karlo.
- *<u>Oni</u> ne forgesas facile **sian** unuan amon.* FE.18
- *<u>Ŝi</u> kombas al **si** la harojn per arĝenta kombilo.* FE.34
- *<u>La malfeliĉa infano</u> forkuris kaj kaŝis **sin** en la plej proksima arbaro.* FE.21
- *Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas **sin** <u>grandaj brutaroj</u>.* FE.34
- *En tiuj ĉi boteletoj **sin** trovas <u>diversaj acidoj</u>.* FE.35
- *Sur la arbo **sin** trovis <u>multe [...] da birdoj</u>.* FE.32
- *<u>Ŝi</u> nomis ŝin **sia** filino.* FE.17
- *Niaj fratoj eliris kun la gastoj el **sia** domo* [= la domo de niaj fratoj] *kaj akompanis ilin ĝis ilia domo* [= la domo de la gastoj]. FE.18
- *<u>Ŝi</u> edziniĝis kun **sia** kuzo.* FE.39
- *<u>Ŝi</u> rakontis al li **sian** tutan aventuron.* FE.23 La aventuro estis de la virino.
- *Ŝteliston <u>neniu</u> lasas en **sian** domon.* FE.37
- *<u>Grandega hundo</u> metis sur min **sian** antaŭan piedegon.* FE.38
- *El ĉiuj **siaj** fratoj <u>Antono</u> estas la malplej saĝa.* FE.10
- *<u>La filino kaj la nepino</u> tenis lin en **siaj** brakoj.* FA4.54 *Sia* montras kaj la filinon, kaj la nepinon.

*Tiu* (§15.1) kaj *ties* (§15.4) iafoje estas uzataj por reprezenti ion, kio antaŭe aperis en nesubjekta rolo. Ili tiam estas kvazaŭ la maloj de *si* kaj *sia*.

### *Si* ne povas esti subjekto

*Si* ne povas esti mem subjekto, nek parto de subjekto, ĉar tiam *si* reprezentus sin mem. Same *sia* ne povas esti parto de subjekto. Ne estas do ĝuste uzi frazojn kiel: **Si manĝas.* *Mi kaj si dancas.* *Petro kaj si fiŝas.* *Mia kaj sia fratoj estas samklasanoj.* *Sia edzino estis kisata de li.** Ne diru do: **<u>Karlo kaj **sia** frato</u> promenas en la parko.** Se oni dirus tian frazon, oni verŝajne intencus, ke *sia* reprezentu Karlon, sed la subjekto ja ne estas *Karlo*, sed **Karlo kaj sia frato**. Diru: *Karlo kaj **lia** frato promenas en la parko.*

Tamen oni povas uzi *si*, se oni ŝanĝas la frazon jene: *Karlo **kun sia frato** promenas en la parko.* Nun la subjekto estas *Karlo*, kaj *sia* ĝuste reprezentas Karlon. La frazparto *kun sia frato* ne estas parto de la subjekto, sed *kun*-komplemento.

Tamen en kompleksaj frazoj (§11.6.2), kie la subjekto mem estas subfrazo aŭ io simila al subfrazo, *si* kaj *sia* ja povas aperi en la subjekto.

### *Si* estas ĉiam triapersona

*Si* ne povas reprezenti la unuan aŭ duan personojn: *mi*, *ni* aŭ *vi* (aŭ *ci*). Ne diru: **<u>Mi</u> venis kun **sia** frato.** Diru: *<u>Mi</u> venis kun **mia** frato.* Sed kiam oni

uzas *sin* prefiksece en kunmetitaj vortoj (§38.4.3), ĝi perdas sian ligon al la tria persono: *sindefendo*, *sinmortigo* k.s.

> **Noto:** En tre malnovaj tekstoj de Zamenhof oni tamen povas trovi kelkajn okazojn, en kiuj *si* reprezentas la unuan aŭ la duan personojn: *Sub arbo, sub verda ni sidis, tenante* ***sin**** [= nin] *koro ĉe koro.* [UL.22] Tia uzo estas malĝusta.

### *Si* en pasiva frazo

*Si* kaj *sia* reprezentas la **gramatikan** subjekton. Tio validas ankaŭ en pasivaj frazoj (§29), kvankam la gramatika subjekto ne estas aganto en tiaj frazoj:

- *La juna viro estis sendita de* ***sia*** *reĝo kiel ambasadoro al la imperiestra kortego de Rusujo.* [FA4.159]
- *Ŝi estas amata por* ***si****, ne por la doto.*
- *Ŝi estas amata de* ***siaj*** *instruistinoj.*
- *Karlo estis akompanata de Petro al* ***sia*** *domo. = ... al la domo de Karlo.*
- *Karlo estis akompanata de Petro al* ***lia*** *domo. = ... al la domo de Petro.*
- *Li sendas leteron al* ***sia*** *kuzo. → Letero estas sendata de li al lia kuzo.* En la pasiva frazo oni ne povas diri *al sia kuzo*, ĉar tiam temus pri la kuzo de la letero.

## 11.6.2. *Si* en kompleksaj frazoj

Kompleksa frazo estas frazo, en kiu aperas krom la ĉefverbo ankaŭ alia aga vorto, aŭ en kiu verbo estas iel subkomprenata. Povas esti, ke la du agoj havas malsamajn subjektojn. En tiaj okazoj oni povas heziti, kiun subjekton *si* reprezentu.

### Subfrazo

La ĉefverbo de subfrazo (§33) havas propran subjekton. Se oni uzas *si* aŭ *sia* en subfrazo, ĝi reprezentu ĉiam la subjekton de la subfrazo, neniam la subjekton de la ĉeffrazo:

- *Elizabeto rigardis la viron, kiu kombis al* ***si*** *la harojn.* La viro kombis la proprajn harojn (ne tiujn de Elizabeto). *Si* reprezentas la subjekton de *kombis*, nome *kiu* (kaj *kiu* reprezentas la viron).
- *Karlo kaj Petro diris, ke la infanoj jam vestis* ***sin****.* La infanoj vestis la proprajn korpojn (ne tiujn de Karlo kaj Petro).
- *Li vidis, ke la hundo ludas per* ***sia*** *pilko.* La pilko apartenas al la hundo (la subjekto de la subfrazo).
- *Dio scias, kion en efektiveco pensis en* ***si*** *la granda buldogo.* [FA1.67] *Si* reprezentas la subjekton de *pensis*.
- *El la kaldrono, en kiu* ***sin*** *trovas bolanta akvo, eliras vaporo.* [FE.25] Subjekto de *trovas* estas *bolanta akvo*. Subjekto de *eliras* estas *vaporo*.
- *Abimeleĥ, la reĝo de la Filiŝtoj, rigardis tra la fenestro, kaj vidis, ke Isaak amuziĝas kun* ***sia*** *edzino Rebeka.* [Gn.26] Rebeka estas la edzino de Isaak (la subjekto de *amuziĝas*), ne de Abimeleĥ (la subjekto de *vidis*). Se estus la edzino de Abimeleĥ, oni dirus *lia edzino*.

- *Mia avo diris, ke <u>li</u> tre amis **sian** patrinon. Sian* reprezentas la subjekton de *amis*, kiu povas esti identa al *mia avo*, sed kiu ankaŭ povas esti alia viro.
- *Ke <u>li</u> vundis **sin**, ne surprizas min.* Ĉi tie *sin* aperas ene de subfrazo. Tiu subfrazo mem rolas kiel subjekto de *surprizas*: *Tio, ke li vundis sin, ne surprizas min.* Kiam la subjekto mem estas subfrazo (aŭ io simila al subfrazo, ekzemple I-verbo aŭ aga O-vorto), *si* kaj *sia* ja povas esti parto de tiu subjekto.

*Si* ne povas esti mem subjekto. Oni ankaŭ ne uzu *si* kiel subjekton de subfrazo, nek kiel parton de la subjekto de subfrazo, kun la celo, ke *si* reprezentu la subjekton de la ĉeffrazo. Ne diru: **<u>Karlo</u> diris, ke **si** venos morgaŭ.** Nek: **<u>Karlo</u> diris, ke **sia** frato venos morgaŭ.** Tiaj konstruoj estas eblaj en iuj lingvoj, sed en Esperanto *si* en subfrazo ĉiam reprezentas la subjekton de la subfrazo mem. La subfrazaj subjektoj tie ĉi estas *si* kaj *sia frato* respektive. Tio signifas, ke *si* reprezentas sin mem, kio ne estas ebla. Oni devas diri: *Karlo diris, ke **li** venos ... / ke **lia** frato venos ...* Ankaŭ ne estas ĝusta: **<u>Ŝi</u> sentis, ke pluvas sur **sin**.** Oni devas diri: *Ŝi sentis, ke pluvas sur **ŝin**.* La subfrazo *pluvas sur ŝin* havas sensubjektan verbon (§30.1).

### I-verbo

Se oni uzas *si* aŭ *sia* kune kun I-verbo, *si* reprezentas la sencan subjekton de la I-verbo (§27.1). Plej ofte tiu senca subjekto estas la sama kiel la subjekto de la ĉefverbo, sed ne ĉiam:

- *<u>Ĉiu homo</u> devas zorgi pri **si** mem. Si* reprezentas la subjekton de *zorgi*. Ĝi estas identa al la subjekto de *devas*.
- *Kiam estas varme, <u>li</u> ŝatas bani **sin** en malvarmega akvo.* La subjekto de *bani* estas identa al la subjekto de *ŝatas*.
- *La sinjoro ordonis al <u>la servisto</u> vesti **sin**.* La subjekto de *ordonis* estas *la sinjoro*. La senca subjekto de *vesti* estas *la servisto*. *Sin* reprezentas la serviston.
- *La sinjoro ordonis al la servisto vesti lin.* La servisto ne vestu sin mem, sed alian viron, plej verŝajne la sinjoron.
- *Ili ne permesas al <u>li</u> lavi **sin** tie.* Li ne lavu la propran korpon tie.
- *Ne estas permesite lavi **sin** tie.* Neniu lavu sin tie. *Sin* reprezentas la sencan subjekton de *lavi*, kiu povas esti ĉiu ajn persono. La tuta I-verba esprimo *lavi sin tie* rolas kiel subjekto de la ĉefverbo *estas*. La I-verba esprimo estas kvazaŭ propra subfrazo, kaj sekve *sin* rajtas aperi ene de tiu subjekto.

Se la senca subjekto de I-verbo ne ĉeestas en la frazo, kaj se ĝi tute ne estas grava, oni normale lasas al *si* reprezenti la subjekton de la ĉefverbo:

- *<u>La reĝo</u> sendis voki **sian** kuraciston.* La senca subjekto de *voki* ne ĉeestas en la frazo, kaj estas malgrava. *Sia* tial povas reprezenti la reĝon. Oni traktas *sendis voki* kiel unu verbon kun nur unu subjekto, la reĝo.

- *La reĝo sendis la serviston voki lian kuraciston.* Ĉi tie la subjekto de *voki* (la servisto) ĉeestas. Se oni dirus *sian kuraciston*, la servisto devus voki sian propran kuraciston, ne tiun de la reĝo.

Tiel oni ofte traktas frazojn kun *lasi* + I-verbo. Se la senca subjekto de la I-verbo estas forlasita, oni traktas *lasi* + I-verbo (§31.6) kiel unu verbon:

- *Pacience ŝi lasis **sin** levi sur la dorson de la ĉevalo.* [FA4.42] *Sin* reprezentas la subjekton de *lasis*. Se oni enmetas la sencan subjekton de *levi*, oni devas ŝanĝi *sin* al *ŝin*, ekz.: *Pacience ŝi lasis al ili **ŝin** levi ... Pacience ŝi lasis ilin levi ŝin ... Pacience ŝi lasis, ke ili ŝin levu ...*
- *Ĉu mia alte fluganta spirito devas lasi alligi **sin** per ĉeno al la limaka irado de la materio?* [Rt.37] *= ... devas lasi ion alligi **ĝin** per ĉeno ... ... devas lasi, ke io alligu ĝin per ĉeno ...*

Normale oni do ne konsideras la sencan subjekton de I-verbo, se ĝi ne ĉeestas en la frazo, sed tio ne estas deviga. Jen zamenhofa ekzemplo, kiu ne sekvas tiun principon: *La imperiestro tuj elsaltis el la lito kaj sendis voki **lian** konstantan kuraciston.* [FA2.29] Temas pri la kuracisto de la imperiestro. Estas rekomendinde uzi *sian* anstataŭ *lian*, ĉar la senca subjekto de *voki* forestas.

Vidu ankaŭ ĉi-poste ĉe "IG-verbo - du agoj en unu verbo".

### Aga O-vorto

Frazparto, kies ĉefvorto estas aga O-vorto, povas esti traktata kvazaŭ ĝi estus subfrazo kun propra subjekto:

- *lia dormado en sia propra lito* funkcias simile al *li dormis en sia propra lito*. Tiu frazparto enhavas kiel ĉefvorton la agan O-vorton *dormado*, kiu estas kvazaŭ verbo. Krome tiu frazparto enhavas la posedan pronomon *lia*, kiu laŭsence estas subjekto de *dormado*. Krome ĉeestas la loka esprimo *en sia propra lito*, en kiu *sia* reprezentas la sencan subjekton de *dormado*.
- *la reveno de Karlo al sia familio = Karlo revenis al sia familio*. Ĉi tie *de Karlo* montras la sencan subjekton de la O-vorto *reveno*.

Jen ekzemploj de tia uzo:

- *Petro pacience aŭskultis la plendadon de Karlo pri ĉiuj **siaj** problemoj.* Karlo plendis pri ĉiuj siaj problemoj. La problemoj estas de Karlo (la senca subjekto de *plendado*), ne de Petro (la subjekto de *aŭskultis*).
- *Karlo parolis kun Eva pri ŝia vojaĝo al **siaj** gepatroj.* Eva vojaĝis al siaj gepatroj.
- *Karlo rakontis pri **sia** vojaĝo al **siaj** gepatroj.* Karlo vojaĝis al siaj gepatroj.
- *Oni plendis al Karlo pri lia vojaĝo al **siaj** gepatroj.* Li vojaĝis al siaj gepatroj.
- *Karlo parolis kun Eva pri ŝia vojaĝo post **sia** operacio.* Ĉi tiu ekzemplo estas dusenca, ĉar *post sia operacio* povas rilati al *paroli* (= *Post **sia** operacio Karlo parolis kun Eva pri ŝia vojaĝo.*), sed ĝi ankaŭ povas rilati

al *vojaĝo* (= *<u>Ŝi</u> vojaĝis post* ***sia*** *operacio.*). La dua interpreto estas multe pli verŝajna, ĉar *post sia operacio* staras tuj post *vojaĝo*. Tiam *sia* en *sia operacio* reprezentas Evan, la sencan subjekton de *vojaĝo*. Sed principe ankaŭ la unua interpreto estas ebla.

- *<u>Lia</u> vojaĝo al* ***sia*** *patrino estis malfacila.* La frazparto *lia vojaĝo al sia patrino* rolas ĉi tie kiel subjekto de la ĉefverbo *estis*. La subjekto estas kvazaŭ subfrazo (*<u>li</u> vojaĝis al* ***sia*** *patrino*), kaj tial *sia* rajtas aperi ene de tiu subjekto.

Sed ofte la senca subjekto de aga O-vorto ne ĉeestas ene de tia O-vorta frazparto. En tiaj okazoj *si* kaj *sia* prefere reprezentu la subjekton de la ĉefverbo laŭ la bazaj reguloj. La praktika uzado estas tamen tre diversa:

- *<u>Ŝi</u> observadis la enportadon de* ***siaj*** *kofroj.* Ĉi tie *siaj* reprezentas la subjekton de la ĉefverbo, ĉar la senca subjekto de *enportado* ne ĉeestas. Oni povus diri *ŝiaj kofroj*, sed tio estas malpli bona, ĉar oni povus pensi, ke estas la kofroj de alia virino.
- *<u>La gepatroj</u> plendis pri la malbona traktado de* ***sia*** *filino.* Aŭ *... de ilia filino*. (Oni malbone traktis ilian filinon.)
- *Nenio por <u>homo</u> estas pli malutila, ol* [estas] *nekonado de* ***siaj*** *propraj posedaĵoj.* [M.73] Ĉi tie la senca subjekto de *nekonado* ne ĉeestas en la O-vorta frazparto, sed ĝi aperas antaŭe: *homo*. Oni povas uzi anstataŭe *la propraj posedaĵoj*, sed uzo de *siaj* estas tute en ordo ĉi tie. La frazparto *nekonado de siaj propraj posedaĵoj* rolas ĉi tie kiel subjekto de subkomprenata *estas*. La subjekto estas kvazaŭ subfrazo (simila al *ke oni ne konas siajn proprajn posedaĵojn* aŭ *ne koni siajn proprajn posedaĵojn*). Tial *sia* ja rajtas esti parto de tiu subjekto.
- *Fanfaronado pri* ***si*** *mem estas tre hontiga.* La senca subjekto de *fanfaronado* forestas (ĝi estas ĝenerala *oni*), sed *si* tamen reprezentas ĝin ĉi tie. Pli bone oni diru *fanfaronado pri oni mem*. Rimarku, ke oni nepre diru *pri si mem*, se oni uzas la I-verbon *fanfaroni*: *Fanfaroni pri* ***si*** *mem estas tre hontige.*
- *Ŝparo de* ***sia*** *mono estas iafoje konsilinda, alifoje malsaĝa.* Principe estas pli bone diri *Ŝparo de onia mono ...*, sed la vorto *onia* (§11.5) estas malofta, kaj multaj evitas ĝin. La rekomendinda solvo estas *Ŝparo de la propra mono ...* Sed kun I-verbo oni ja uzu *sian* (ne *onian*): *Ŝpari sian monon/la propran monon estas iafoje konsilinde, alifoje malsaĝe.*

## Participo

Participo kun A-finaĵo (§28.1) ĉiam estas rekta aŭ perverba priskribo de io. Se *si* aŭ *sia* aperas kune kun tia participo, *si* ĉiam reprezentas tion, kion la participo priskribas. La participo kaj ĝia rekta priskribo estas kvazaŭ subfrazo:

- *Li ekvidis <u>la anĝelon de la Eternulo</u>, starantan sur la vojo kun elingigita glavo en* ***sia*** *mano.* [Nm.22] La anĝelo staris kun glavo en sia mano.

- *Karlo promenis kun virino vestita per* ***sia*** *plej bela vesto.* Ŝi estis vestita per sia plej bela vesto. *Vestita* priskribas la virinon. *Sia* do reprezentas la virinon.
- **Karlo laŭtlegis poemon verkitan de* ***sia*** *patrino.** = *... poemon, kiu estis verkita de sia patrino.* La poemo estas subjekto de *estis verkita*, kaj *si* do reprezentas la poemon. La intencita senco tamen estas, ke la poemo estis verkita de la patrino de Karlo. Estu do *... verkitan de* ***lia*** *patrino*.
- *La viro staranta tie apud* ***sia*** *aŭto nomiĝas Karlo.* = *La viro, kiu staras tie apud sia aŭto ...* Subjekto de *nomiĝas* estas *la viro staranta tie apud sia aŭto*. La participa priskribo de *la viro* rolas kvazaŭ subfrazo. Tial *sia* povas esti parto de la subjekto.

Participo kun E-finaĵo (§28.2) ĉiam havas la saman subjekton kiel la ĉef-verbo:

- *Lavinte* ***siajn*** *vestaĵojn Karlo kuiris vespermanĝon.* Karlo estis lavinta siajn vestaĵojn.
- *Karlo promenis kun virino vestite per* ***sia*** *plej bela vesto.* Karlo estis vestita per sia plej bela vesto, kiam li promenis kun virino.

Participo kun O-finaĵo (§28.3) preskaŭ ĉiam montras personon. Kvankam tiaj participoj enhavas ankaŭ agan signifon, oni tamen traktu ilin kiel neagajn vortojn, uzante *si* kaj *sia* tute laŭ la bazaj reguloj:

- *Elizabeto parolis kun la lernantoj de* ***sia*** *patro.* Temas pri la patro de Elizabeto.
- *Eliris el inter vi homoj sentaŭgaj kaj forlogis la loĝantojn de* ***sia*** *urbo.* [Re.13] Temas pri la urbo de la homoj sentaŭgaj. Se oni anstataŭe uzas A-finaĵan participon, ĉio ŝanĝiĝas: *Eliris el inter vi homoj sentaŭgaj kaj forlogis la homojn loĝantajn en* ***ilia*** *urbo.*
- *Seir estos submetito de* ***siaj*** *malamikoj.* [Nm.24] Temas pri la malamikoj de Seir.

### Kompara esprimo kun *kiel* aŭ *ol*

Komparaj esprimoj enkondukitaj de *kiel* aŭ *ol* (§20.1) ofte reprezentas frazan ideon kun subkomprenata verbo. *Si* ene de tia kompara esprimo reprezentu la subjekton de tiu subkomprenata verbo:

- *Ŝi amas lin (same) kiel* ***sin*** *mem.* = *Ŝi amas lin, kiel ŝi amas sin mem.*
- *Ŝi amas lin (same) kiel* ***li*** *mem.* = *Ŝi amas lin, kiel li mem amas sin.*
- *Li punis ilin same kiel* ***siajn*** *fratojn.* = *... same kiel li punis siajn fratojn.*
- *Ŝi estas (tiel) saĝa kiel* ***ŝia*** *fratino* [estas saĝa].
- *Ili ne estu, kiel* ***iliaj*** *patroj* [estis], *generacio ribela kaj perfida.* [Ps.78]
- *Eble li ankaŭ mortos, kiel* ***liaj*** *fratoj* [mortis]. [Gn.38]
- *Ŝi amas lin pli ol* [ŝi amas] ***sin*** *mem.*
- *Ŝi amas lin pli ol* ***li*** *mem* [amas sin].
- *Ili denove fariĝis pli malbonaj ol* ***iliaj*** *patroj* [estis]. [Jĝ.2]

- *La patroj punis la fremdajn knabojn pli ol* [ili (la patroj) punis] ***siajn** proprajn filojn.*
- *Tiu domo havas fenestrojn pli grandajn ol **ĝia** pordo* [estas granda].

Rimarku, ke esprimoj kiel *kompare kun ..., en komparo kun ...* k.s. ne funkcias kiel apartaj subfrazoj: *Kompare kun **sia** patro Elizabeto estas tre alta. ≈ Elizabeto estas pli alta ol ŝia patro.* Sed: *Se oni komparas kun ŝia patro, Elizabeto estas tre alta.*

## Kompleksa rekta priskribo

Ofte kompleksa rekta priskribo de O-vorto funkcias kiel subfrazo kun subkomprenata verbo. Tiam *si* reprezentas la subjekton de la subkomprenata verbo. Tiu subjekto estas ĉiam identa al la priskribata O-vorto:

- *Ili vizitis muzeon faman pro **siaj** belaj pentraĵoj. = ... muzeon, kiu estas fama pro **siaj** belaj pentraĵoj.* La pentraĵoj apartenas al la muzeo. La esprimo *faman pro siaj belaj pentraĵoj* estas rekta priskribo de *muzeon*.
- *Picasso vizitis muzeon faman pro **liaj** pentraĵoj. = ... muzeon, kiu estas fama pro **liaj** pentraĵoj.* La pentraĵoj estas de Picasso.
- *Ŝi rimarkis* [...] *la reĝon de la maro kun **sia** krono sur la kapo.* [FA1.99] *= ... la reĝon de la maro, kiu sidis kun **sia** krono sur la kapo.* La tuta *kun*-esprimo estas rekta priskribo de *la reĝon de la maro* (§7.1).
- *Ĉiuj dormis, krom la direktilisto apud **sia** direktilo.* [FA1.101] *= ... krom la direktilisto, kiu staris apud **sia** direktilo.*
- *Ŝi* [= Marta] *kaptis tiun solan kaj laŭ **ŝia** opinio lastan tabulon de savo.* [M.24] *= Marta kaptis tiun tabulon de savo, kiu estis sola kaj laŭ ŝia opinio lasta.* Temas pri la opinio de Marta. La tuta kompleksa A-vorta priskribo de *tabulon* rolas kvazaŭ subfrazo. Se oni uzus *sia opinio*, temus pri la opinio de la tabulo.

Iafoje Zamenhof traktis ankaŭ aliajn frazpartojn kvazaŭ ili estus frazoj kun propra verbo kaj propra subjekto: *Ĉiu el la Izraelidoj devas resti fortike ĉe la posedaĵo de la tribo de **liaj** patroj.* [Nm.36] *= ... ĉe la posedaĵo, kiu apartenas al la tribo de liaj patroj.* Prefere estu *siaj patroj* (*si* reprezentas la subjekton de la ĉefverbo *devas*).

## Perverba priskribo

Perverba priskribo de subjekto (§25.1.1) estas traktata kiel simpla frazparto. Oni uzu la bazajn principojn pri *si* kaj *sia*:

- *Ĉi tiu kreskaĵo estas sola en **sia** speco.* [Rn.46]
- *Ilia militistaro estas glora pro **sia** disciplino.* [DL.23]
- *Li fariĝos **sia** propra sinjoro.* [FA2.75]

En perverba priskribo de objekto (§25.1.2) la uzo estas tamen varia, kaj la reguloj ne estas tute fiksitaj. En simplaj okazoj oni prefere uzu la bazajn principojn pri *si* kaj *sia*:

- *Ŝi* [= la patrino] *nomis ŝin **sia** filino.* [FE.17]

- *La popolo faris lin super **si** estro kaj kondukanto.* [Jĝ.11] Li poste estis estro super la popolo (ne super si mem).
- *La tuta Juda popolo prenis Uzijan* [...] *kaj faris lin reĝo anstataŭ **lia** patro Amacja.* [Kr2.26] Se oni dirus ***sia** patro*, temus pri la patro de la Juda popolo.
- *La membroj elektis lin prezidanto pro **sia** bonvolo.* La membroj estis bonvolaj, kaj tial elektis lin prezidanto.

Sed Zamenhof iafoje traktis rektan objekton kaj ties perverban priskribon kvazaŭ subfrazon:

- *Ĉiuj estis ensorĉitaj de ĝi, aparte la reĝido, kiu nomis la reĝidinon **lia** amata trovitino.* [FA1.98] (= *... nomis ŝin dirante, ke ŝi estas lia amata trovitino.*) Ĉi tie *sia* estas tamen preferinda.
- *La registaroj trovos la demandon* [...] *sufiĉe maturiĝinta kaj inda je **ilia** enmiksiĝo.* [FK.268] = *La registaroj trovos, ke la demando estas sufiĉe maturiĝinta kaj inda je ilia enmiksiĝo.* Ĉi tie *ilia* kredeble estas la pli bona elekto. La perverba priskribo de la objekto estas longa kaj kompleksa, kaj estas konvene trakti ĝin kvazaŭ subfrazon.

  **Noto:** *PAG* traktas la uzon de *si* kaj *sia* en perverba priskribo de objekto tute alie, rekomendante diri ekz. *ili elektis lin **ilia** gvidanto* (anstataŭ ***sia** gvidanto*). PMEG tamen uzas kiel bazon la jenan modelan ekzemplon en la Fundamento: *Ŝi nomis ŝin **sia** filino.* [FE.17]

## Apudmeto

Apudmeto (§25.3) povas esti komprenata kvazaŭ mallongigita subfrazo: *Tie venas Karlo, **mia amiko**.* = *Tie venas Karlo, kiu estas mia amiko.* Normale oni tamen traktas tiajn apudmetojn kiel tute ordinarajn frazpartojn uzante la bazajn principojn pri *si* kaj *sia*:

- *Petro prezentis Karlon, **sian** amikon.* (= *Petro prezentis Karlon, kiu estas lia amiko.*)
- *Ili verŝis senkulpan sangon, la sangon de **siaj** filoj kaj filinoj.* [Ps.106]
- *Malsaĝiĝis la princoj de Coan, trompiĝis la princoj de Nof, erarigis Egiptujon, la fundamenton de **siaj** gentoj.* [Jes.19]

Iafoje tamen Zamenhof tamen traktis tian apudmeton kvazaŭ subfrazon:

- *Ili ne defalis de la Eternulo, Dio de **iliaj** patroj.* [Kr2.34] = *... la Eternulo, kiu estas Dio de iliaj patroj.*
- *Ili forlasis la Eternulon, **ilian** Dion.* [Rĝ1.9] = *... la Eternulon, kiu estas ilia Dio.* Ĉi tie ***sian** Dion* estas preferinda. = *Ili forlasis la Eternulon. Ili forlasis **sian** Dion.*

## *Laŭ*-esprimo

Esprimoj kun *laŭ* (§12.3.6.5), kiel *laŭ li*, *laŭ ili*, *laŭ ŝia opinio*, *laŭ lia rakonto* (ankaŭ *ŝiaopinie*, *liarakonte*...) ofte estas uzataj por esprimi *li opinias, ke ...*, *laŭ ŝia opinio estas tiel, ke ...* kaj simile. Ekzemple: *Laŭ ŝi estas tro varme.* = *Ŝi opinias, ke estas tro varme.* Tiaj *laŭ*-esprimoj ofte rolas kvazaŭ apartaj frazoj, kaj sekve oni tendencas eviti *si* kaj *sia* en ili:

- ***Laŭ ŝi**, Esperanton ŝi eklernis nur hieraŭ. = Laŭ ŝiaj klarigoj estas tiel, ke Esperanton ŝi eklernis nur hieraŭ.* Ne estas konsilinde uzi *Laŭ si, ...* (kun la simpla pronomo *si*) en tiaj ĉi okazoj.
- ***Laŭ li mem**, Zamenhof kreis Esperanton por la tuta homaro. = Laŭ tio, kion li mem skribis, Zamenhof kreis Esperanton por la tuta homaro.* Prefere ne: *Laŭ si mem, Zamenhof kreis ...*
- ***Laŭ lia opinio**, li agis tute honeste. = Laŭ lia opinio estas tiel, ke li agis tute honeste.* Kiam temas pri poseda pronomo, oni tamen pli ofte uzas *sia* ol *lia/ŝia/ĝia/ilia* en tiaj ĉi esprimoj: ***Laŭ sia (propra) opinio**, li agis ...*
- ***Laŭ iliaj asertoj**, ili nenion vidis. = Laŭ iliaj asertoj, estas tiel, ke ili nenion vidis.* Aŭ: *Laŭ siaj asertoj, ili ...*
- ***Liaopinie** [= laŭ lia opinio], li certe venkos.* Aŭ *Siaopinie*.

Rimarku, ke oni ofte apartigas tiajn esprimojn per komo.

Atentu, ke *laŭ*-esprimo ne ĉiam havas tian sencon kvazaŭ ĝi estus aparta frazo. La jena ekzemplo estas dusenca: ***Laŭ sia opinio** li ĉiam agas.* Ĝi povas signifi *Li opinias, ke li ĉiam agas.* Tiam oni povas ankaŭ diri *Laŭ lia opinio ...* Sed ĝi ankaŭ povas signifi: *Li ĉiam agas **laŭ sia opinio** (= konforme al sia opinio).* En tiu dua senco *laŭ sia opinio* estas tute ordinara maniera komplemento, kaj oni uzu *si* kaj *sia* laŭ la bazaj reguloj.

## IG-verbo - du agoj en unu verbo

Se oni faras IG-verbon el alia verbo, oni kreas vorton, kiu esprimas samtempe du agojn: *lavi → lavigi* = "igi (iun) lavi". En *lavigi* estas du agoj: *igi* kaj *lavi*. Ĉe tiaj verboj *si* kaj *sia* reprezentu la subjekton de la tuta verbo (= la subjekto de *igi*), tute laŭ la bazaj reguloj: *La grafo lavigis (al la servistoj) **siajn** vestaĵojn.* Temas pri la vestaĵoj de la grafo, ne tiuj de la servistoj. Alie estas, se oni disigas *lavigi* en du verbojn, *igi lavi*, menciante eksplicite la sencan subjekton de *lavi*: *La grafo igis la servistojn lavi liajn vestaĵojn.* Se oni tie dirus *siajn vestaĵojn*, temus pri la vestaĵoj de la servistoj (la senca subjekto de *lavi*). Se oni uzas *igis lavi*, sed ne mencias la servistojn, oni prefere uzu *siajn*: *La grafo igis lavi **siajn** vestaĵojn.* Vidu la ĉi-antaŭajn klarigojn pri *si* kaj *sia* ĉe I-verboj.

## Hezito inter la unua aŭ dua persono kaj la tria persono

Iafoje vorto, kiu principe estas triapersona, povas pro speciala frazkonstruo tamen esti duapersona laŭsence. Tio okazas tamen tre malofte. Oni povas uzi *vi* aŭ *si* laŭplaĉe por reprezenti tian vorton:

- *Ho, vi Diano, kiu **vian** fraton amegas pli ol ĉion en la mondo.* [IT.65] Oni povus uzi *sian* anstataŭ *vian*, ĉar *kiu* estas per si mem triapersona, sed *kiu* egalas ĉi tie al *vi Diano*, kaj estas tial ankaŭ duapersona.
- *Ĉu nun estos paco, ho Zimri, mortiginto de **sia** sinjoro?* [Rĝ2.9] La mortiginto estas Zimri, la alparolato. Tial oni povus ankaŭ uzi *via*.

Simile povas iafoje okazi pri la unua persono:

- *Mi ĉiam estis persono, <u>kiu</u> bone zorgis pri **siaj/miaj** bestoj. Siaj* rilatas al *kiu*, kiu reprezentas la vorton *persono*, kiu tamen laŭsence egalas al *mi*, kaj tial oni ankaŭ povas uzi *miaj* anstataŭ *siaj*.
- *Ni ĉiam estis personoj, <u>kiuj</u> bone zorgis pri **siaj/niaj** bestoj.*

### 11.6.3. *Si* en fiksitaj esprimoj

En kelkaj fiksitaj esprimoj *si* ne obeas al la ordinaraj reguloj.

- ***siatempe*** = "en tiu tempo, en la priparolata tempo, en konvena tempo". Kiam *siatempe* havas tiun ĉi specialan signifon, oni diras ĉiam *siatempe* sendepende de la subjekto: *Mi volis **siatempe** proponi regulon.* [LR.98] *Mi ankoraŭ bone rememoras la grandan timon* [...]*, kun kiu mi rigardis **sia-tempe** tiujn heroojn.* [IT.48]
- **O-vorto + *en si*** = "... tia, kia ĝi estas". Kiam temas pri tiu ĉi speciala signifo, oni uzas *si* eĉ se tio, kion *si* reprezentas, ne estas subjekto: *Se oni rigardas **la aferon en si**, oni vidas ... = Se oni rigardas la aferon tia, kia ĝi estas ...*
- ***per si (mem)*** (§12.3.6.7) = "per propra efiko, sen ia rimedo". Oni uzas ĉiam *si* senkonsidere de la subjekto: *Oni komprenas liajn gestojn **per si mem**.*
- ***inter si*** = "reciproke, unu kun la alia". En tiu esprimo *si* estas ofte uzata pri afero, kiu ne estas subjekto: *"Lingvo Internacia" kaj "lingvo tutmonda" estas du tute malsamaj objektoj, <u>kiujn</u> miksi **inter si** oni neniel devas.* [FK.259]
- ***sia*** = "ĝia propra, kiu apartenas al ĝi aparte". Tian signifon havas *sia* ĉefe en proverboj. Tiam *sia* estas uzata ankaŭ por nesubjektaj aferoj: *Al <u>ĉiu</u> **sia** propra estas ĉarma kaj kara.* [PE.347] *<u>Ĉio</u> **sia** estas plej ĉarma.* [PE.357] ***<u>Sia</u>** estas kara pli ol najbara.* [PE.765]

# 12. Rolmontriloj

Frazo konsistas el ĉefverbo kaj frazpartoj (§3.2), kiuj ludas diversajn rolojn rilate al la ĉefverbo. Por montri la frazrolojn de frazpartoj oni uzas rolmontrilojn. La rolmontriloj estas de tri specoj:

- Nenio (§12.1). Kelkaj frazroloj, precipe subjekto, estas rekoneblaj per tio, ke ili **ne** havas rolmontrilon. Manko de rolmontrilo estas do mem rolmontrilo.
- La finaĵo N (§12.2). La frazrolo objekto, kaj ankaŭ kelkaj aliaj roloj, estas rekonebla per la rolfinaĵo N.
- Rolvortetoj (§12.3). Tre multaj diversspecaj frazroloj estas rekoneblaj per diversaj rolvortetoj.

La elekto de rolmontrilo ne estas ĉiam rigore difinita. En multaj okazoj oni havas plurajn eblojn.

Iafoje oni uzas por esprimi tre precizan signifon, duoblajn rolmontrilojn: du rolvortetojn aŭ rolvorteton kune kun N-finaĵo (§12.2.5).

Iafoje E-vorto kunlaboras kun rolmontrilo tiel, ke la E-vorto ŝajnas esti rolmontrilo. Tion oni povas nomi rolvortaĵo (§12.3.7).

## 12.1. Frazroloj sen rolmontrilo

Manko de rolmontrilo povas montri kvar malsamajn rolojn:

- Subjekto (§12.1.1)
- Alvoko (§12.1.2)
- Perverba priskribo (§12.1.3)
- Identiga priskribo (§12.1.4)

### 12.1.1. Subjekto

Subjekto estas tio, kio faras la agon de la ĉefverbo. La subjekto de ĉefverbo estu ĉiam sen rolmontrilo. La preciza senco de la rolo subjekto tre dependas de la verbo. Jen kelkaj ekzemploj:

#### Aganto — tipa subjekto

Tipa subjekto estas aganto, kiu aktive plenumas agon aŭ (vole) kaŭzas ian okazaĵon:

- ***La gefianĉoj*** *<u>promenadis</u> sub la freŝa superpendanta laŭba tegmento.* [FA3.29]
- ***La soldato*** *<u>dehakis</u> al ŝi la kapon.* [FA1.8]
- ***Gerda*** *<u>karesis</u> al ŝi la vangojn.* [FA2.75]
- *Subite* ***granda hundo*** *<u>alsaltis</u> el inter la arbetaĵoj.* [FA1.171]
- *En tiu momento el la ĝardeno <u>venis</u>* ***du malgrandaj knaboj****.* [FA1.149]
- ***Mi*** *bele <u>kovris</u> mian liton per multkoloraj teksaĵoj el Egiptujo.* [SS.7]
- ***La patro*** *<u>donis</u> al mi dolĉan pomon.* [FE.10] Komparu kun *ricevi*.

### Malpli tipaj subjektoj

Ofte tamen subjekto ne estas aktiva konscia aganto aŭ kaŭzanto, sed malaktiva aganto, aŭ rimedo, aŭ io kio simple troviĝas ie, aŭ io kio moviĝas senvole, aŭ io kio havas ian econ, aŭ io kio nur ekzistas, k.t.p.:

- *Ĉu **vi** aŭdis jam la historion pri la malnova strata lanterno?* [FA2.117] Oni ne "plenumas" aŭdadon. Tio simple okazas.
- *Fine krevis **unu ovo** post la alia.* [FA2.34] La krevado okazis al la ovoj.
- ***La folioj** faladis de la arboj.* [FA3.59] La falado okazis al la folioj.
- *Sur ĉiuj kampoj ĉirkaŭe kreskis **greno, sekalo, hordeo** kaj **aveno**.* [FA2.20]
- *Estis iam **malgranda knabino**.* [FA2.98] La knabino ne faris agon, ŝi simple ekzistis.
- ***Avineto** estas tre maljuna.* [FA2.90] La avineto havas econ.
- ***La sovaĝa vinberbranĉo** havis sur si bluajn kaj ruĝajn berojn.* [FA1.188] La branĉo ne agis. Ĝi estis la loko, kie la beroj troviĝis.
- ***Tapiŝoj** kovris la plankon.* [FA3.59] La tapiŝoj troviĝis sur la planko.
- *Ha, jen kuŝas ja **paro da galoŝoj**!* [FA1.123] La galoŝoj troviĝas ie.
- ***Ora ŝlosilo** ĉiun pordon malfermas.* [PE.1005] La ŝlosilo estas ilo por la malfermado. Normale *malfermi* havas la veran aganton kiel subjekton. Sed se la vera aganto tute ne estas menciita, ofte la ilo anstataŭe aperas kiel subjekto.
- *Vespere antaŭ la pordo haltis **veturilo**.* [FA2.148] Vera aganto estas la homo, kiu veturigis la veturilon.
- *De la patro **mi** ricevis libron.* [FE.9] Vera aganto estas la patro. Mi estas la celo de la donado. Komparu kun *doni*, ĉe kiu la vera aganto estas subjekto.
- *Pasis **jaroj**.* [FA3.103] La subjekto ne estas aganto, sed tempo.

### La verbo decidas

Por ĝuste uzi subjektojn oni devas por ĉiu verbo scii, kio povas aperi kiel subjekto de ĝuste tiu verbo. Vidu kelkajn ekzemplojn de verboj kaj frazroloj (§30).

## 12.1.2. Alvoko

La frazrolo alvoko montras, al kiu aŭ kiuj oni direktas la eldiraĵon. Alvoko tipe estas la nomo de la alparolato, eldirata aparte por veki ties atenton, sed oni ankaŭ povas uzi titolon aŭ alispecan O-vorton, kiu reprezentas la alvokaton. Alvoko estas normale apartigita de la resto de la frazo per komo aŭ komoj, aŭ aperas skribe eĉ kiel aparta frazo.

Alvoko estu ĉiam **sen rolmontrilo**:

- ***Karlo**, venis poŝto por vi. Karlo* estas la nomo de la alparolato.
- ***Elizabeto**, ĉu vi scias, kie la hundo estas?*
- *Mi konstatis, **kara Petro**, ke vi ne estis en la lernejo hodiaŭ.*

- *Mi deziras al vi bonan tagon,* ***sinjoro****!* [FE.10] Oni titolas la alparolaton per la vorto *sinjoro*.
- ***Sinjoroj****, vi estas neĝentilaj.* [FE.16]
- ***Karaj infanoj****, estu ĉiam honestaj!* [FE.20]
- ***Estimata prezidanto****, mi ŝatus fari jenan proponon.*
- ***Patrino****, mi pensas, ke mia sano denove reboniĝas!* [FA3.69]
- ***Sinjorinoj kaj sinjoroj****! Ĉe la malfermo de nia kongreso vi atendas de mi ian parolon.* [OV.369]

Oni neniam uzu la artikolon *la* antaŭ alvoko (§9.1.1).

Iaj ekkriaj esprimoj tre similas al alvoko:

- ***Infero*** *kaj* ***diablo****!* [Rt.16]
- ***Dio****, savu min!* [Rt.122]
- ***Mil diabloj****!*

Voko al potenco, kiu iel donu forton al la eldiro, povas aperi kun rolvorteto, ekz. *per* (§12.3.6.7), *pro* (§12.3.6.11) aŭ *je* (§12.3.1). Gramatike tiam ne temas pri la frazrolo alvoko: ***Pro la ĉielo****, havu kompaton!* [Rt.57]

### 12.1.3. Perverba priskribo

Perverba priskribo estas frazparto, kiu **priskribas** la subjekton aŭ la objekton **pere de la ĉefverbo**. Perverba priskribo normale estas frazparto sen rolmontrilo:

- <u>*Ŝi*</u> *estis* ***terure malbela****.* [FA1.5] *Terure malbela* estas priskribo de *ŝi*. La priskribo estas perata de la verbo *estis*.
- <u>*La juna vidvino*</u> *fariĝis denove* ***fianĉino****.* [FE.33] *Fianĉino* estas priskribo de *la juna vidvino* pere de la verbo *fariĝis*.
- *La ĝojo kaj surprizo faris* <u>*lin*</u> ***muta****!* [FA3.90] *Muta* priskribas *lin* pere de la verbo *faris*.
- <u>*Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn*</u> *ni nomas* ***tolaĵo****.* [FE.35] *Tolaĵo* estas perverba priskribo de la objektoj (*ĉemizojn, kolumojn ...*). La priskribon peras la verbo *nomas*.

Legu detale pri perverba priskribo en §25.1.

### 12.1.4. Identiga priskribo

Identiga priskribo estas postmetita rekta priskribo de O-vorto. Ĝi montras la identecon de la afero. Identiga priskribo estu sen rolmontrilo:

- *Li fianĉiĝis kun* <u>*fraŭlino*</u> ***Berto****.* [FE.39] *Berto* estas identiga priskribo de la vorto *fraŭlino*.
- *En la* <u>*lingvo*</u> ***"Esperanto"*** *ni vidas la estontan lingvon de la tuta mondo.* [FE.22] La nomo *Esperanto* estas identiga priskribo de la vorto *lingvo*.
- *Ili vizitis la* <u>*insulon*</u> ***Gronlando****.*

Legu detale pri identiga priskribo en §25.2.

## 12.2. La rolfinaĵo N

### 12.2.1. N — bazaj reguloj

La finaĵo N povas almetiĝi kiel finaĵo de diversspecaj vortoj.

- O-vortoj (§4): *domo* → *domo**n***, *hundo* → *hundo**n***, *virino* → *virino**n***, *seĝoj* → *seĝoj**n***, *vidoj* → *vidoj**n***
- A-vortoj (§5): *ruĝa* → *ruĝa**n***, *granda* → *granda**n***, *virina* → *virina**n***, *verdaj* → *verdaj**n***, *knabaj* → *knabaj**n***
- personaj pronomoj (§11.1): *mi* → *mi**n***, *ĝi* → *ĝi**n***, *ili* → *ili**n***, *oni* → *oni**n***
- tabelvortoj (§13.1) je U, O, A kaj E: *kiu* → *kiu**n***, *iu* → *iu**n***, *ĉiuj* → *ĉiuj**n***, *kio* → *kio**n***, *ĉio* → *ĉio**n***, *ia* → *ia**n***, *nenia* → *nenia**n***, *tiaj* → *tiaj**n***, *tie* → *tie**n***, *ie* → *ie**n***
- lokaj E-vortoj (§6.1): *hejme* → *hejme**n***, *strande* → *strande**n*** (E-vortoj sen loka signifo ne povas ricevi N-finaĵon)

Legu ankaŭ pri N-finaĵo ĉe ne-esperantigitaj nomoj en §35.2.

La finaĵo N staras ĉiam post eventuala J-finaĵo: *domojn*, *hundojn*, *virinojn*, *ruĝajn*, *grandajn*, *virinajn*, *kiujn*, *kiajn* (ne **domonj**, **ruĝanj**, **kiunj** k.s.).

Se O-vorto havas la finaĵon N, tiam havu tiun saman finaĵon ankaŭ ĉiuj A-vortoj kaj tabelvortoj je U kaj A, kiuj estas **rektaj** priskriboj de tiu O-vorto:

- ***grandan*** *domon*
- *domon* ***ruĝan***
- ***tiun*** *domon*
- ***tiajn*** *domojn*
- ***tiun*** *domon* ***grandan***
- ***tian malgrandan*** *domon* ***antikvan***
- *la* ***malgrandajn*** *domojn*
- *domojn sen ĉiu ajn dubo tre* ***antikvajn***

**Perverba** priskribo (§25.1.2) de O-vorto tamen ne havu N-finaĵon: *Mi re-farbis la flavajn seĝojn* ***blankaj****.*

### Signifo

N-finaĵo povas montri:

- objekton (§12.2.2)
- mezuron (§12.2.3)
- tempopunkton (§12.2.4)
- direkton (§12.2.5)

Krome oni principe rajtas uzi N anstataŭ *je* (§12.2.6), sed tio estas pli teoria ol praktika.

Kiam frazparto kun N-finaĵo (N-frazparto) montras ion alian ol objekto, ĝi rolas kiel **komplemento** (N-komplemento) aŭ kiel **priskribo** (N-priskribo). Ofte oni ja povas alternative uzi rolvorteton.

Se oni pasivigas (§29) frazon, la objekto fariĝas subjekto. N-komplementoj kaj N-priskriboj tamen ne estas objektoj, kaj ne povas fariĝi subjekto de pasiva frazo.

#### N kune kun rolvorteto

N-finaĵo povas kunlabori kun loka rolvorteto (§12.3.4). Tiam N montras direkton (§12.2.5).

Iafoje N-finaĵo kunlaboras kun la rolvortetoj *anstataŭ* (§12.3.6.1) kaj *krom* (§12.3.6.3). Tiam N montras objekton (§12.2.2).

#### Rolvortaĵoj kun N-finaĵo

Ofte N-finaĵo kunlaboras kun E-vorto en rolvortaĵo (§12.3.7): *responde vian leteron*, *rilate tion*.

#### Pli ol unu N-frazparto

Povas esti en frazo samtempe pli ol unu frazparto kun N-finaĵo. Ekzemple povas esti du aŭ pli da rektaj objektoj (§12.2.2) de la sama verbo: *Mi havas **bovon** kaj **bovinon**.* [FE.33] Aŭ povas esti ekz. tempa mezuro (§12.2.3) kaj rekta objekto: ***Eĉ unu momenton** oni ne lasis **min** trankvila.* [FA3.7] Aŭ povas esti tempopunkto (§12.2.4), rekta objekto kaj mezuro (§12.2.3): ***Tiun vesperon** ili alportis **keston** pezan pli ol **cent kilogramojn**.* Estas multaj ebloj.

Sed oni ne uzu samtempe plurajn rektajn objektojn kun malsamaj rilatoj al la verbo. Ekzemple oni povas diri *li **min** petis pri helpo* aŭ *li petis **helpon** de mi*, sed ne **li **min** petis **helpon****. Legu pli pri verboj kun alternativaj objektoj en §30.7.

### 12.2.2. N por objekto

Objekto montras tion, kio estas **rekte trafata de ago**.

En multaj situacioj iu aŭ io agas rilate al iu aŭ io alia. Iel oni devas montri, kiu agas, kaj kiu estas trafata de la ago. Se oni parolas ekz. pri hundo kaj kato, kaj uzas la verbon *mordas*, tiam estas tre grave scii, kiu faras la mordon, kaj kiu suferas la mordon. En Esperanto oni faras distingon inter la aganto (kiu havas nenian rolmontrilon, §12.1) kaj la objekto (kiu havas N-finaĵon, §12.2). La vortordo (§34) ne ŝanĝas la bazan signifon:

- *Kato mordas hundon.*
- *Kato hundon mordas.*
- *Mordas kato hundon.*
- *Mordas hundon kato.*
- *Hundon kato mordas.*
- *Hundon mordas kato.*

Pro la N-finaĵo, ĉiu el la ses samsignifaj variantoj estas klare komprenebla. La unua varianto kun la ordo "subjekto - ĉefverbo - objekto" estas la plej ofta vortordo en Esperanto, sed ĉiuj variantoj estas tute eblaj. Ili donas diversajn nuancojn kaj diversajn emfazojn.

- *Mi amas vin.*
- *Mi vin amas.*
- *Vin mi amas.*
- *Vin amas mi.*
- *Amas mi vin.*
- *Amas vin mi.*

Ĉiuj ses variantoj havas la saman bazan signifon: La agon *amas* faras "mi", kaj la amo iras al "vi".

## Signifo

La preciza senco de la rolo objekto tre dependas de la verbo. Jen kelkaj ekzemploj:

### Tipaj objektoj

Plej tipa objekto estas io, kio neniel kaŭzas la agon de la ĉefverbo, nek mem agas iel, sed kio estas iel rekte "trafata" aŭ "tuŝata" (en konkreta aŭ abstrakta senco) de ago, kiun faras aŭ kaŭzas la subjekto. La ago do iras de la subjekto, la aktiva aganto (§12.1.1) al la objekto (pasiva ricevanto de la ago):

- *Mi batas **Aleksandron**.* [FE.9] Aleksandro estas konkrete, korpe trafata de la batoj.
- *Infano, ne tuŝu **la spegulon**!* [FE.20] La spegulo estus konkrete tuŝata.
- *Mi amas **la patron**.* [FE.8] La amo "trafas" la patron en abstrakta senco.
- *Li amas **min**, sed mi **lin** ne amas.* [FE.18] La N-finaĵo montras la celon de la amo.
- *La patro donis al mi **dolĉan pomon**.* [FE.10] La pomo estis "trafita" de movo. Ĝi estis movita de li al mi.
- *La patro ne legas **libron**, sed li skribas **leteron**.* [FE.9]
- *Jen estas la pomo, **kiun** mi trovis.* [FE.6]

### Malpli tipaj objektoj

Ofte objekto ne estas vere trafata de ago. Ĉe multaj verboj la objekta rolo estas alia. Ĝi povas esti ekz. posedaĵo (*havi*, *posedi*, *teni*, *aĉeti*...), perceptaĵo (*vidi*, *aŭdi*, *flari*, *gustumi*, *senti*, *legi*, *rigardi*, *aŭskulti*, *atendi*, *atenti*, *serĉi*, *trovi*...) aŭ kreaĵo (*fari*, *krei*, *produkti*, *ripari*, *difini*...):

- *En la tago ni vidas **la helan sunon**.* [FE.10] Efektive la lumo venas de la suno al niaj okuloj. La suno do iel kaŭzas la vidadon. Tamen *la suno* aperas gramatike kiel objekto, ĉar tiel funkcias la verbo *vidi*.
- *Unu vidvino havis **du filinojn**.* [FE.11] La filinoj apartenis al la vidvino. Ili troviĝis ĉe ŝi.

- *De la patro mi ricevis **libron**.* [FE.9] La libro moviĝis al la subjekto.
- *En rapideco ili preterpasis **ŝin** je kelke da paŝoj.* [M.202] Ŝi estas kvazaŭ loko, preter kiu okazis moviĝo.
- *Dio kreis **la homon** el la tero.* [FA3.117] La objekto ne vere estis trafita de la krea ago, ĉar ĝi eĉ ne ekzistis antaŭ la ago.
- *Li kantas **tre belan kanton**.* [FE.40] La objekto ne vere estas io, kion la ago trafas, sed montras la enhavon de la ago.
- *En la lasta tempo ni faris **malgrandan vojaĝon**.* [FA1.225] La objekto estas la ago mem. La ĉefverbo *fari* (§31.4) ne montras mem ian klaran signifon. Nur per la objekto *malgrandan vojaĝon* oni ekscias, kiu estis la efektiva ago.

## Objekto kiel priskribo

Normale objekto estas memstara frazparto, kiu rilatas al verbo. Sed objekto ankaŭ povas esti **priskribo** de A-vorto aŭ E-vorto, kiu montras objektan agon:

- *Trovinte **pomon**, mi ĝin manĝis.* [FE.22] *= Post kiam mi trovis **pomon**, mi ĝin manĝis.*
- *Ili venos al la ĉi tie starantaj monumentoj kaj al la **sian brilon** perdintaj lokoj.* [FA3.54] La frazo estus pli klara kun alia vortordo: *... al la lokoj perdintaj **sian brilon**. = ... al la lokoj, kiuj perdis **sian brilon**.*
- *Koncerne **la muzikon*** [...] *mi devas scii la gradon de via artisma klereco.* [M.26] *≈ Kiam la afero koncernas **la muzikon** ...*
- *Li vidis **ĉaron** tirantan bovon. = Li vidis bovon, kiu tiris **ĉaron**.* Eble pli bone: *Li vidis bovon tirantan **ĉaron**.* Estas plej bone eviti N-finaĵan objekton de A-vorto, kiu mem havas N-finaĵon, ĉar la rilatoj inter la vortoj fariĝas malklaraj.
- *Li estos dirinta al mi **la veron**.* [FE.24] *La veron* estas objekto de la A-vorto *dirinta*. Ofte oni tamen diras, ke esprimo kiel *estos dirinta* rolas kiel unu verbo. La objekto tiam rilatas al tiu tuta kunmetita verbo (§28.4).

N-finaĵa objekto ankaŭ povas esti priskribo de aga O-vorto, kvankam tia uzo estas ekstreme malofta: *La tirado **la ĉaron** estis malfacila por la bovo.* La ĉaro estas objekto de la tirado. *Dankon pro la elekto **min**.* Normale oni tamen uzas *de* por montri la objekton de aga O-vorto (§12.3.2.2): *La tirado **de la ĉaro** estis malfacila por la bovo. Dankon pro la elekto **de mi**.*

## Pasivigo

Frazon kun objekto oni povas transformi en pasivan frazon (§29). Tiam la objekto fariĝas subjekto.

## Ne uzu N-finaĵon ĉe perverbaj priskriboj

*Esti* kaj similaj verboj ne estas agoj, kiuj direktiĝas al io. Frazparto, kiu rilatas al *esti*, ne estas objekto, sed perverba priskribo (§25.1), kiu neniam havas N-finaĵon: *Tio estas **tri seĝoj**. Mi estas **kuracisto**. Ŝi fariĝis **doktoro**. Mia patro nomiĝas **Karlo**.*

Ankaŭ ne uzu N-finaĵon ĉe perverba priskribo de objekto (§25.1.2): *Mi trovis la filmon tre **bona**.*

### Ne uzu N-finaĵon ĉe postmetita subjekto

La subjekto de verbo povas stari ankaŭ post la ĉefverbo. Ĉe iuj verboj tia vortordo estas tre ofte uzata, ekz. *okazi*, *manki*, *resti* kaj *aperi*. Ne uzu N-finaĵon ĉe tiaj postmetitaj subjektoj:

- *Hieraŭ okazis grava afero.* (= *Grava afero okazis hieraŭ.*) Subjekto de la ago *okazis* estas *grava afero*. Ne diru: **Hieraŭ okazis grava**n** afero**n**.** Se oni aŭdas tian frazon, oni devas sin demandi, "**kio** okazis la gravan aferon". Sed "okazi" ne estas ago, kiu iras de aganto al io, kio estas trafata de tiu ago. La verbo "okazi" havas nur unu (ĉefan) rolanton. Tio estas la okazaĵo. La okazaĵo ĉiam aperas kiel subjekto de la verbo *okazi*, kaj do ne havu N-finaĵon.
- *Mankas pano.* (= *Pano mankas.*) La pano faras la agon "manki". Ne diru: **Mankas pano**n**.**
- *Restis nur unu persono.* (= *Nur unu persono restis.*) La persono faris la agon "resti". Ne diru: **Restis nur unu persono**n**.**
- *Aperis nova eldono de la libro.* (= *Nova eldono de la libro aperis.*) Ne diru: **Aperis nova**n** eldono**n** de la libro.**

### Objekto sen N-finaĵo

Sufiĉe ofte la rekta objekto de frazo estas io, kio ne povas havi N-finaĵon, ekz. ne-esperantigita nomo aŭ alia fremda vorto (§35.2), citaĵo (§36), kvanta vorteto (§24.4), kvanta E-vorto (§24.3), *ambaŭ* (§15.5), I-verbo (§27.3), *ke*-frazo (§33.2.2) aŭ demanda subfrazo (§33.3). En tiaj okazoj oni devas el la kunteksto kompreni, kio estas objekto. Kelkaj eksperimentas per objekta rolvorteto por tiaj okazoj. Iuj provas por tiu celo uzi la rolvorteton *je* (§12.3.1), dum aliaj eksperimentas per la nova objekta rolvorteto **na**° (§19).

### "Nerekta objekto"

En kelkaj lingvoj oni distingas apud (rekta) objekto ankaŭ **nerektan objekton**. La nerekta objekto estas tiu, kiu ricevas ion, aŭ tiu, kiu profitas aŭ malprofitas de la ago. En Esperanto oni uzas ĉefe la rolvorteton *al* (§12.3.5.1) por montri tiajn signifojn: ***Al leono** ne donu la manon.* [FE.7] *La reĝidino donis **al li** glavon.* [FA1.198] *Oni tiel malhelpis **al mi**, ke mi malbonigis mian tutan laboron.* [FE.33]

Ĉe iuj verboj ricevanto/profitanto/malprofitanto povas aperi aŭ kiel *al*-komplemento, aŭ kiel objekto kun N-finaĵo. Tiaj verboj havas alternativajn frazkonstruojn (§30.7).

### 12.2.3. N por mezuro

Mezuraj komplementoj kaj priskriboj ofte havas N-finaĵon. Plej ofta estas tempa mezuro, sed aliaj mezuroj funkcias tute same. Ankaŭ *je* (§12.3.1) povas esti uzata por montri mezuron, sed N-finaĵo estas pli ofta.

#### Tempa mezuro

N-finaĵo ĉe tempa esprimo povas montri mezuron de tempolongo, tempodaŭro aŭ ofteco. Tiaj esprimoj respondas al la demandoj: *kiel longe?*, *(dum) kiom da tempo?*, *kiel ofte?* k.s.

Plej ofte tempomezura N-frazparto estas komplemento de verbo:

- *Mi veturis **du tagojn** kaj **unu nokton**.* [FE.29] = *... dum du tagoj kaj unu nokto.*
- *Kiam li estis ĉe mi, li staris **tutan horon** apud la fenestro.* [FE.26] = *... dum tuta horo.*
- *Li nenion manĝis **la tutan tagon** kaj **la tutan nokton**.* [Sm1.28]
- *Pri via fideleco al nia afero mi kompreneble ne dubas eĉ **unu minuton**.* [OV.531]
- *Li estas morte malsana, li ne vivos pli, ol **unu tagon**.* [FE.31]
- *Volu sidiĝi kaj atendi **momenton**, ĝis mi finos la interparoladon kun tiuj sinjorinoj.* [M.20]
- *La edziĝa festo daŭris **ok tagojn**.* [FA1.12]
- *Tio daŭris nur **malgrandan momenton**.* [FA1.136]
- *Ŝi ploris antaŭ li dum la sep tagoj, **kiujn** daŭris ĉe ili la festeno.* [Jĝ.14] La festeno daŭris sep tagojn.
- *Tiu ĉi malfeliĉa infano devis **du fojojn** en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko.* [FE.13]
- *Ŝi aĝis **tridek jarojn**.* Moderna esprimo. Zamenhof dirus: *Ŝi havis aĝon de tridek jaroj.*
- *La horloĝo malfruas **kvin minutojn**.* = *... per kvin minutoj. ... je kvin minutoj.*

Tempomezura N-frazparto povas ankaŭ esti priskribo de A-vorto aŭ E-vorto:

- *Li estis **dudek du jarojn** <u>aĝa</u>.* = *... je dudek du jaroj aĝa.*
- *La horloĝo estas **kvin minutojn** <u>malfrua</u>.*
- *Mi aŭskultis paroladon de la prezidanto **du horojn** <u>longan</u>.* La A-vorto *longan* estas rekta priskribo de *paroladon*. La mezuro *du horojn* estas rekta priskribo de la vorto *longan*. La N-finaĵo de *longan* estas objekta. La N-finaĵo de *du horojn* montras mezuron de la longeco. En tiaj okazoj, kiam rekontiĝas du malsamsignifaj N-finaĵoj, povas esti pli bone uzi *je* (§12.3.1) por la mezuro: *... paroladon **je du horoj** <u>longan</u>*. Se la A-vorto staras post sia O-vorto, povas esti pli klare, se oni metas la mezuron post la A-vorto: *... paroladon <u>longan</u> **je du horoj***.

- ***Unu momenton*** *poste ŝi malaperis malantaŭ ili.* [FA1.194] *Unu momenton* montras la kvanton de tempo, kiu pasis post io.
- ***Unu tagon*** *antaŭe ni per niaj spionoj eksciis, ke Roller estas bone enpeklita.* [Rt.62] *Unu tagon* montras tempan distancon. Unu tago pasis de la eksciado ĝis tiu tempo, kiun montras *antaŭe* (= "antaŭ tiam", "antaŭ tio", "antaŭ tiu tago" k.s.).

Rimarku, ke oni ne diru *Unu tagon* ****antaŭ**** *ni per niaj spionoj eksciis ...* *Antaŭ* estas rolvorteto (§12.3.4.1), kaj devas stari antaŭ io, kies frazrolon ĝi montras.

Oni povas uzi *antaŭ* kiel rolmontrilon de la tempodaŭro (§12.3.4.1) mem, sed tio donas iom alian sencon: *Antaŭ unu tago ni eksciis ...* = ***Unu tagon*** *antaŭ nun ni eksciis ...* = *Hieraŭ ni eksciis ...* Tute simile oni uzas *post* kaj *poste*: ***Unu momenton*** *poste ŝi malaperos.* (= ***Unu momenton*** *post tiam ŝi malaperos.*) *Post unu momento ŝi malaperos.* (= ***Unu momenton*** *post nun ŝi malaperos.*)

Tempomezura N-frazparto povas ankaŭ esti priskribo de E-vorteca vorteto:

- *Ŝi estas* ***du jarojn*** *kaj* ***tri monatojn*** *pli aĝa ol mi.* Rimarku, ke N-priskribo de *pli* aŭ *malpli* montras diferencon: *Dek jarojn aĝa* montras aĝon. *Dek jarojn (mal)pli aĝa* montras aĝodiferencon.
- *Mi tre bedaŭras, ke mi ne sciis Vian intencon* ***kelkajn monatojn*** *pli frue.* [L1.322]
- *Mi alvenis* ***duonan minuton*** *tro malfrue, kaj tial maltrafis la trajnon. Duonan minuton* montras diferencon.

Tempomezura N-frazparto povas ankaŭ kunlabori kun tempa *post*-komplemento aŭ tempa *antaŭ*-komplemento por kune montri tempon. Tia N-frazparto iamaniere priskribas la tutan postan komplementon (kune kun ĝia rolmontrilo):

- ***Du tagojn*** *post tio ŝi forveturis Norvegujon.* [FA4.186] Pasis du tagoj post "tio".
- ***Longan tempon*** *post kiam la Eternulo donis al Izrael ripozon kontraŭ ĉiuj iliaj malamikoj ĉirkaŭe, Josuo maljuniĝis, atingis profundan aĝon.* [Js.23]
- *Ĉiu diskutota demando estos ja publikigita* ***tri monatojn*** *antaŭ la kongreso.* [OV.460]

Komparu kun tempomezura komplemento kiel priskribo de *poste* aŭ *antaŭe*: ***Du tagojn*** *poste ŝi forveturis ...* ***Longan tempon*** *poste Josuo ... ... publikigita* ***tri monatojn*** *antaŭe.*

Oni uzas N-finaĵon ankaŭ por montri tempopunkton (§12.2.4).

## Diversaj mezuroj

Aliaj mezuroj funkcias tute same kiel tempaj mezuroj. Povas esti mezuro de spaca longeco, alteco, larĝeco, distanco, profundo, pezo, kosto k.t.p. Ili respondas al la demandoj *kiom?*, *kiel multe?*, *kiel malproksime?*, *kiel longe?*, *kiel alte?*, *kiel profunde?*, *kiel peze?* k.s.:

- *Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo kostas **naŭ frankojn**.* [FE.14] *Naŭ frankoj* ne estas objekto, sed mezura komplemento, kiu montras koston.
- *Li [...] ŝanceliĝis **kelkajn paŝojn** returne kaj denove falis sur la teron.* [BV.78] = *... per/je kelkaj paŝoj ...*
- *Vi devas kuri **pli ol cent mejlojn**.* [FA2.71]
- *Kiam ili forveturis, mi sekvis ilin **kelkan distancon**.* [FA1.228]
- *La kampoj de tiuj urboj, kiujn vi donos al la Levidoj, devas etendiĝi **mil ulnojn** ekster la muroj de la urboj ĉirkaŭe.* [Nm.35]
- *La vojo larĝis **dudek metrojn** aŭ iom pli.*
- *La maljuna paŝtisto ne pezis eĉ **duonon** de tio, **kion** pezis la malgranda Niko.* [FA1.23]
- *La monto Everesto estas **ok mil okcent kvardek ok metrojn** <u>alta</u>.* La mezuro estas priskribo de la vorto *alta*.
- *Ŝi kondukis Elizon **kelkan distancon** <u>pluen</u> ĝis deklivo.* [FA1.163]
- *Ili staris nur **kelkajn metrojn** <u>for</u> de mi.*
- *La domo estis **ducent metrojn** <u>distanca</u>. Ducent metrojn* estas mezura priskribo de la vorto *distanca*.
- ***Dek kvin ulnojn** <u>pli</u> alte leviĝis la akvo kaj kovris la montojn.* [Gn.7] *Dek kvin ulnojn* montras diferencon de alteco, ĉar ĝi priskribas la vorton *pli*.
- *Ŝia pakaĵo estis **tridek kilogramojn** <u>peza</u>, sed la lia estis ankoraŭ **dek kilogramojn** <u>pli</u> peza.*
- *Ili konstruis **ducent metrojn** <u>altan</u> turon.* = *... turon <u>altan</u> **je ducent metroj**.*
- *Se ni havus materialajn rimedojn, nia afero irus **cent fojojn** <u>pli</u> rapide.* [OV.102]
- *Mia ringo valoras tri kaj duonon da spesmiloj, sed vi donis al mi kvar. Mi sekve ricevis **duonon da spesmilo** <u>tro</u> multe.* [M.192] *Duonon (da spesmilo)* ne estas objekto, sed mezura priskribo de *tro*. Vera objekto estas *tro multe* (§24.3).

Se oni montras distancon per mezura komplemento sen mencii la lokon, de kie oni mezuras la distancon, oni ne uzas N-finaĵon, sed ĉiam *je* (§12.3.1): ***Je cent metroj** staris alia homo.* = ***Cent metrojn** <u>for</u> "de la priparolata loko"... La urbo situas **je dekkilometra distanco**.* = *... dek kilometrojn <u>for</u> "de la priparolata loko".*

Distancmezura N-frazparto povas kunlabori kun (loka) komplemento, kiu havas ian rolvorteton, por kune montri precizan lokon. Iasence tia N-frazparto estas priskribo de la tuta posta komplemento (kune kun ĝia rolmontrilo):

- ***Kelkajn paŝojn*** <u>*malantaŭ Eva*</u> *staris fremda viro.* La mezura N-frazparto *kelkajn paŝojn* precizigas la lokan komplementon *malantaŭ Eva* montrante la distancon inter Eva kaj la viro.
- ***Unu metron*** <u>*sub la akvosurfaco*</u> *naĝis ŝarko.*
- *La tegmento elstaris* ***almenaŭ tri metrojn*** <u>*trans la rando*</u> *de la verando.*
- *Elizabeto parkis la aŭton* ***unu metron*** <u>*de la trotuaro*</u>*.*
- ***Nur unu klafton*** <u>*sub la akvo*</u> *staris la ŝiprompitaĵo.* [FA4.111] 1 klafto ≈ 2 metroj.

### Mezura priskribo de O-vorto

Mezura priskribo de O-vorto havas la rolvorteton *de* (§12.3.2.3): *aĝo de dudek jaroj*, *longo de du metroj*. Oni povas ankaŭ uzi A-vorton: *dumetra longo*.

### Mezuro sen rolmontrilo

Mezuro povas ankaŭ aperi en frazrolo, kiu ne havu rolmontrilon:

- ***Dek du monatoj*** *estas longa tempo. Dek du monatoj* estas ĉi tie subjekto.
- *Pasis* ***cent jaroj****.* [FA3.47] (= ***Cent jaroj*** *pasis.*) *Cent jaroj* rolas kiel subjekto.
- *La longo de ĉiu tapiŝo estu* ***dudek ok ulnoj****, kaj la larĝo de ĉiu tapiŝo estu* ***kvar ulnoj****.* [Er.26] La mezuroj estas perverbaj priskriboj (§25.1) de la subjektoj *la longo* kaj *la larĝo*.

## 12.2.4. N por tempopunkto

Frazparto kun N-finaĵo povas esti komplemento, kiu montras tempopunkton. Tia N-komplemento respondas la demandojn: *kiam?*, *kiudate?*, *kiutage?*, *kiujare?*, *kiufoje?* k.s. Ofte oni povas alternative uzi rolvorteton, ekz. *en*:

- ***Unu tagon*** *estis forta pluvo.* [FA2.152] *= En unu tago ...*
- ***Unu vesperon*** *venis Aftanido, gracia kiel kano, forta kaj bruna.* [FA1.232]
- *De tiu tempo ili vizitadis ŝin* ***ĉiun nokton****.* [FA1.99]
- *Marta pli atente ol* ***la pasintan tagon*** *ekzamenis per la rigardo la grandanombran anaron de siaj samlaborulinoj kaj samsortulinoj.* [M.111]
- *Georgo Vaŝington estis naskita* ***la dudek duan*** *de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua.* [FE.12] *= En la dudek dua tago de Februaro ...*
- ***La tagon de sankta Marteno*** *estis farita pri ŝi edziĝanonco.* [FA3.92]
- ***La unuan fojon en ŝia vivo*** *en la brusto de Marta leviĝis ondo de flamanta indigno.* [M.140]
- ***La sekvantan dimanĉon*** *Knut denove iris tien.* [FA3.61] *= En la sekvanta dimanĉo ...*

Ĉe nomoj de semajntagoj, O-formo kun N-finaĵo ofte montras precizan konatan tagon: *dimanĉon* = “en certa konata dimanĉo”, eĉ se oni ne uzas *la*. En tiaj okazoj la tagonomoj estas uzataj propranomece (§9.1.6):

- *Mi* [...] *alvenos en Lyon **lundon** la 30-an de Aŭgusto.* L2.250 Temas pri unu klare difinita lundo.
- ***Merkredon** mi kantos, kaj, se vi havas tempon, mi sendos al vi bileton.* FA3.61 = *En la sekva merkredo ...*

En la komenco de letero oni ofte uzas N-finaĵon por montri la daton (kaj iafoje la semajntagon) kvazaŭ la dato estus tempa komplemento de frazo: *(ĵaŭdon) la 12-an de Majo 1994*. Ofte oni tamen mallongigas la skriban formon, ekz. *12. Majo 1994*.

Ankaŭ *je* (§12.3.1) povas esti uzata por montri tempopunkton. En horesprimoj (§23.8) oni normale ne uzas N-finaĵon, sed *je* (§12.3.1), precipe se la vorto *horo* estas forlasita, por ne konfuzi horon kun dato (§23.9):

- *Tio okazis **la dekan**.* = Tio okazis en la deka tago de la monato.
- *Tio okazis **je la deka**.* = Tio okazis je la deka horo de la tago.

### Tempopunkto sen rolmontrilo

Tempopunkto povas ankaŭ aperi en frazrolo, kiu ne havu rolmontrilon:

- *Hodiaŭ estas **sabato**, kaj morgaŭ estos **dimanĉo**.* FE.20 *Sabato* kaj *dimanĉo* rolas kiel subjektoj (aŭ eble kiel perverbaj priskriboj de nenio, §25.1.1).
- ***La sekva tago** estis **vendredo**. La sekva tago* estas subjekto. *Vendredo* estas perverba priskribo de la subjekto.
- *Tio ĉi estis **la unua fojo**, ke ŝi nomis ŝin sia filino.* FE.17 *La unua fojo, ke ...* estas perverba priskribo de *tio*.

## 12.2.5. N por direkto

La finaĵo N povas montri direkton de movo, responde al la demandoj *al kiu loko?*, *en kiu direkto?* k.s. Kiam direkta N estas uzata post O-vorto aŭ O-vorteca vorteto, ĝi montras efektivan atingon de la celo. Komparu kun la rolvorteto *al* (§12.3.5.1), kiu havas similan sencon, sed ne nepre esprimas atingon de la celo.

Direkta N-finaĵo ĉiam esprimas almovon, neniam demovon. Oni do ne uzu N, kiam laŭsence estu *de* (§12.3.2) aŭ *el* (§12.3.5.2). Iafoje oni tamen renkontas frazojn kiel: *Ili eliris la buso**n***. En tiaj okazoj temas pri objekta N-finaĵo, la buso estas objekto de la ago “eliri”. Estas tamen plej klare kaj preferinde diri: *Ili eliris **el** la buso.* Movaj verboj kun prefikseca *de* neniam havas tian rektan objekton. Oni ĉiam diras *defali **de** io*, *deiri **de** io*, neniam **defali io**n****, **deiri io**n****.

## Direkta N kun loka rolvorteto

Direkta N-finaĵo povas uziĝi kune kun loka rolvorteto (§12.3.4), ekz. *en* (§12.3.4.6), *sur* (§12.3.4.13) kaj *sub* (§12.3.4.11). Kiam loka rolvorteto montras simplan pozicion, oni uzas ĝin sen la finaĵo N. Sed se oni volas montri, ke io moviĝas al tia loko, oni devas aldoni alian rolmontrilon, kiu montras direkton. Oni povus uzi *al* (*al en*, *al sur*, *al sub* k.a.), sed en la praktiko oni uzas ĉiam direktan N-finaĵon:

- *sur la tablo* = en pozicio sur la tablo → *sur la tablo**n*** = al pozicio sur la tablo, al sur la tablo
- *sub la granda lito* = en loko sub la granda lito → *sub la granda**n** lito**n*** = al loko sub la granda lito, al sub la granda lito
- *La birdo flugas **en la ĉambro** (= ĝi estas en la ĉambro kaj flugas en ĝi).* [FE.26]
- *La birdo flugas **en la ĉambron** (= ĝi estas ekster la ĉambro kaj flugas nun en ĝin).* [FE.26] La birdo flugas al la interno de la ĉambro.
- *Marta metis la libron **sur la tablon**.* [M.128] Ĝi estis en alia loko, kaj ŝi movis ĝin al la tablosurfaco.
- *Mi jam devas iri **en la regnon ĉielan**!* [FA1.23] Mi nun ne estas en la regno ĉiela, sed mi jam devas iri al la interno de tiu loko.
- *Sed li enligis sian tutan monon **en ŝian antaŭtukon**, prenis ĝin **sur la dorson**, kiel paksakon, metis la fajrilon **en la poŝon** kaj iris rekte **en la urbon**.* [FA1.8]

Direkta N-finaĵo estas nepra nur kiam la loka rolvorteto rilatas al esprimo, kiu estas klare mova, kaj se klare temas pri moviĝo al la priparolata loko:

- *La vento forblovis de mia kapo la ĉapon, kaj ĝi, flugante, pendiĝis **sur la branĉoj** de la arbeto.* [FE.39] Oni povus diri *sur la branĉojn*, sed *pendiĝi* ne estas klare mova vorto, kaj tial N-finaĵo ne estas deviga.
- *Li sidiĝis **sur seĝo** apud la juna virino.* [M.45] La verbo *sidiĝi* precipe esprimas ŝanĝon de korpopozicio, ne movon, kaj tial Zamenhof preskaŭ ĉiam uzis ĝin sen N-finaĵo por direkto. Sed se oni volas esprimi aŭ emfazi, ke la sidiĝanto moviĝas al la sidloko, oni ja povas diri *sidiĝi sur seĝon*, *sidiĝi en fotelon*, k.s.
- *Moseo prenis sian edzinon kaj siajn filojn kaj sidigis ilin **sur azeno**.* [Er.4] *Sidigi* ne estas klare mova, sed oni ankaŭ povas diri *sur azenon*.
- ***Sur la koverto** ŝi skribis unu el la grafaj familinomoj.* [M.22] En esprimoj kiel *skribi ion sur papero*, *noti ion en libro* k.s. la ideo de movado estas tre malforta, kaj oni normale ne uzu direktan N-finaĵon. Sed se oni volas emfaze esprimi tian direktan nuancon, oni ja povas uzi N: *Baruĥ enskribis **en libron-rulaĵon** sub diktado de Jeremia ĉiujn vortojn de la Eternulo.* [Jr.36] *Enskribi* estas pli moveca ol simpla *skribi*.
- *Karlo parolis **en mikrofono**.* La ideo de movado estas ĉi tie tre malforta, sed ankaŭ estas eble diri *en mikrofonon*.

Eĉ se la verbo estas mova, ne nepre temas pri moviĝo al la loko montrita per la loka rolvorteto:

- *Se vi vidos, ke azeno de via malamiko falis **sub sia ŝarĝo**, ne forlasu ĝin, sed alportu helpon kune kun li.* [Er.23] *Fali* estas ja mova verbo, sed la azeno jam troviĝis sub la ŝarĝo. Poste ĝi tie falis.

Ankaŭ ĉe aliaj lokaj rolvortetoj ol la plej oftaj *en*, *sur* kaj *sub* oni uzas direktan N-finaĵon laŭ la samaj principoj:

- *Gardu vin, ke vi ne venu plu **antaŭ mian vizaĝon**.* [Er.10] = *... al loko antaŭ mia vizaĝo. ... al antaŭ mia vizaĝo.*
- *Ĝian kropon kun ĝiaj plumoj li forigu kaj ĵetu ĝin **apud la altaron**.* [Lv.1] = *... al (loko) apud la altaro.*
- *La virino subite leviĝis kaj ĵetis ambaŭ brakojn **ĉirkaŭ la kolon** de la knabino.* [M.8] = *... al (pozicio) ĉirkaŭ la kolo ...*
- *Oni elkondukis lin **ekster la urbon** kaj priĵetis lin per ŝtonoj.* [Rĝ1.21] Li estis en la urbo, sed oni movis lin al loko ekster la urbo.
- *Li metis ĝin* [= la nukson] ***inter la pordon kaj sojlon** kaj alpremis la pordon; la nukso krakis kaj rompiĝis.* [FA3.89] Li metis la nukson en lokon inter la pordo kaj la sojlo.
- *Morgaŭ mi venos **ĉe vin**.* Tradicie oni preferas: *Morgaŭ mi venos **al vi**.* (§12.3.4.3)

Vidu cetere la klarigojn pri la unuopaj lokaj rolvortetoj (§12.3.4).

### Subkomprenata celo

En iaj okazoj oni kutimas ne uzi direktan N-finaĵon, ĉar la vera celo estas subkomprenata esprimo. Tiu esprimo havus N-finaĵon, se oni enmetus ĝin:

- *Jakob enfosis ilin **sub la kverko**.* [Gn.35] Oni ne diras *sub la kverkon*, ĉar la vera celo estas la grundo: *Jakob enfosis ilin **en la grundon** sub la kverko.*
- *Oni metis **antaŭ mi** manĝilaron.* [FE.34] Mankas direkta N post *mi*, ĉar oni povus diri: *Oni metis **sur la tablon** antaŭ mi manĝilaron.*

Tamen ne estas eraro diri *sub la kverkon* kaj *antaŭ min*, ĉar ankaŭ tiuj esprimoj povas esti rigardataj kiel celoj en tiuj frazoj.

Ĉe la verbo *alveni* oni povas uzi *en* kun aŭ sen direkta N-finaĵo:

- *Fine ili alvenis **en la varmajn landojn**.* [FA1.51] La celo de la vojaĝo estis la varmaj landoj.
- *En la sekvanta tago* [...] *ni alvenis **en Kopenhago**.* [FA4.131] La alvenado al la preciza celloko okazis en Kopenhago.

### Figura direkto

Lokaj rolvortetoj estas ofte uzataj en figura senco. Io abstrakta, neloka, estas esprimata kvazaŭ loko. Ankaŭ tiam oni povas uzi direktan N-finaĵon por esprimi figuran direkton. Ekz. *en* estas uzata figure pri statoj kaj formoj (§12.3.4.6). *En* + N-finaĵo do povas montri statoŝanĝon, moviĝon de unu

stato aŭ formo al alia: *Mi ŝanĝos ilian malĝojon **en ĝojon**.* [Jr.31] *La popolo Izraela dividiĝis **en du partojn**.* [Rĝ1.16]

### Rolvortetoj, kiuj mem montras direkton

Kelkaj rolvortetoj per si mem montras direkton: *al*, *ĝis*, *el* (§12.3.5) kaj *de* (§12.3.2). Tiuj rolvortetoj neniam montras pozicion. Post ili oni ne uzu N-finaĵon: *al la urbo*, *ĝis la fino*, *el la lernejo*, *de la komenco*, *disde la patrino*, *ekde Februaro*, *de post la somero*, *for de Tokio* (ne **al mi**n****, kio signifus **al al mi**).

### Direkta N post lokaj E-vortoj

Oni povas meti la finaĵon N ankaŭ post lokaj E-vortoj por montri direkton al ia loko:

- *hejme* = en la hejmo → *hejmen* = al la hejmo
- *urbe* = en la urbo → *urben* = al la urbo
- *ekstere* = ekster io → *eksteren* = al la ekstero de io
- *Ni veturas **Romen**. = Ni veturas **al Romo**.*
- *Tra la malgrandaj fenestroj oni povis rigardi **internen** en la salonojn.* [FA1.153] *Internen* = al la interno, en la internon.

N-finaĵo povas aperi post E-vortoj nur por montri direkton, neniam por montri objekton, mezuron aŭ tempopunkton. Iafoje kvantaj E-vortoj rolas kiel objekto (§24.3), sed ili tamen ne povas ricevi N-finaĵon.

Ankaŭ tabelvortoj je E (§14.1.1) montras lokon, kaj povas ricevi N-finaĵon por direkto:

- *tie* = en tiu loko → *tien* = al tiu loko, en tiu direkto
- *kie* = en kiu loko → *kien* = al kiu loko, en kiu direkto
- *ĉie* = en ĉiu loko → *ĉien* = al ĉiu loko, en ĉiu direkto
- *ie* = en iu loko → *ien* = al iu loko, en iu direkto
- *nenie* = en neniu loko → *nenien* = al neniu loko, en neniu direkto
- *Ni iru, sinjorino, **ien aliloken**.* [M.109] *= ... al iu alia loko.*

Kiam direkta N uziĝas post E-vortoj kaj tabelvortoj je E, la senco estas simila al la rolvorteto *al* (§12.3.5.1). Tio signifas, ke ne nepre temas pri atingo de la montrita loko.

### Sola direkta N-finaĵo ĉe O-vorto

Oni ankaŭ povas montri movan direkton per N-finaĵo ĉe O-vorto, kiu ne havas alian rolmontrilon:

- *Morgaŭ mi veturos **Parizon**.* [FE.28] *= ... al Parizo.* Temas pri veturo por atingi kaj eniri en la urbon.
- *Devas ekzisti okcidenta vojo **Hindujon**.* [FK.254] *= ... vojo, kiu atingas Hindujon.*
- *La vagonaro kuras de Hanovero **Berlinon**.* [FK.209]

Praktike oni tiamaniere uzas solan direktan N-finaĵon preskaŭ nur ĉe propraj nomoj de urboj, landoj k.s., kiel en la ĉi-antaŭaj ekzemploj, kaj nur kiam temas pri iro al la interno de la loko. Oni do ne diru ekz. **Mi metis la seĝon* ***la salonon****.** Oni diru: *Mi metis la seĝon* ***en la salonon****.*

Entute tia ĉi uzo de sola direkta N-finaĵo ĉe O-vorto estas nuntempe tre malofta, preskaŭ arĥaika. Oni ĝenerale preferas uzi la rolvorteton *al* (§12.3.5.1): *al Parizo*, *al Hindujo*.

### Mallogika uzo de direkta N

Direkta N aperas ankaŭ en vortoj kiel *pluen*, *renkonten*, *tiudirekten*, *reen* k.s., kie la N-finaĵo principe estas mallogika, ĉar *plu* (§14.2.8), *renkonte*, *tiudirekte* kaj *ree* ne montras lokon. Iafoje tia mallogika uzo tamen helpas al klareco, kaj tiaj esprimoj ne estas nepre evitendaj. Ili estas tradiciaj kaj facile kompreneblaj. Normale tamen simpla *plue*, *renkonte* kaj *tiudirekte* sufiĉas, sed en *reen* la N-finaĵo estas neevitebla, ĉar simpla *ree* signifas *denove, refoje, plian fojon*:

- *Ŝi kondukis Elizon kelkan distancon* ***pluen*** *ĝis deklivo.* [FA1.163]
- *Mi ekiris* ***renkonten*** *al ŝi.* Simpla *renkonte* sufiĉas.
- *La ŝtelistoj kuris* ***tiudirekten****. Tiudirekte* estas pli logika, sed eble iom malpli klara.
- *La pendolo ĉe la granda horloĝo iradis tien kaj* ***reen****.* [FA2.146]

Atentu, ke en vortkunmetaĵoj *reen* iafoje povus esti miskomprenata kiel la prefikso RE (§38.3.10) + la rolvorteto *en*: *reeniri* = “iri reen” aŭ “denove eniri”. Ordinare la kunteksto tamen malebligas miskomprenon.

## 12.2.6. N anstataŭ *je*

Teorie oni povas ĉiam anstataŭigi la rolvorteton *je* (§12.3.1) per N, laŭ regulo en la Fundamenta Gramatiko (§40). Jen zamenhofaj ekzemploj de tia uzo:

- *Mi ridas* ***je lia naiveco****.* [FE.29] *= Mi ridas* ***pro lia naiveco****.* [FE.29] *= Mi ridas* ***lian naivecon****.* [FE.29]
- *Neniam ŝi miros* ***je sia propra malaltiĝo****. → Neniam ŝi miros* ***sian propran malaltiĝon****.* [M.178] Nuntempe oni prefere diras *pri sia propra malaltiĝo* aŭ *pro sia propra malaltiĝo*.

Tiaj esprimoj kun N-finaĵo estas nuntempe tamen sufiĉe nekutimaj. Ordinare oni uzas taŭgan rolvorteton.

### Pozicio

N-finaĵo estas sufiĉe ofte uzata por montri pozicion de parto (ofte korpoparto). Teorie N tiam anstataŭas la rolvorteton *je* (§12.3.1), sed praktike la alternativo al N estas *kun* (§12.3.6.4) en tiaj esprimoj. Tia N-komplemento ĉiam kunlaboras kun esprimo de pozicio aŭ direkto:

- *Ĉu vi permesos al mi pendigi tiun ĉi kanajlon sub la ĉielo* ***la kapon*** *malsupren?* [Rt.70] *= ... kun/je la kapo malsupren.*

- *Ĉu vi pensas, ke Dio permesos, ke unu sola homo* [...] *renversu ĉion* ***la supron*** *malsupren?* Rt.130

Oni povus ankaŭ diri, ke *havante*, *tenante*, *metinte* aŭ simile estas subkomprenata. Tiam temas pri objekto:

- *Li sidis (havante)* ***la brakojn*** *kunmetitaj.*
- *Li haltis dum momento, (tenante)* ***la kapon*** *klinita iom flanken.*

Se la posta pozicia esprimo estas A-vorto (*klinita*, *kunmetitaj*), ĝi ne havu N-finaĵon, ĉar ĝi estas perverba priskribo de la objekto (§25.1.2), kvankam la verbo (en participa formo) estas subkomprenata.

## 12.3. Rolvortetoj

Rolvorteto estas vorteto, kiun oni uzas antaŭ frazparto por montri la frazrolon: ***sur*** *la tablo*, ***pri*** *aliaj temoj*, ***al*** *mia kuzo*.

Frazparto kun rolvorteto povas esti komplemento de verbo: *Ĝi <u>kuŝas</u>* ***sur la tablo****. La prezidanto <u>ekparolis</u>* ***pri aliaj temoj****. Ŝi <u>donis</u> ĝin* ***al mia kuzo****.*

Frazparto kun rolvorteto ankaŭ povas esti priskribo de alia frazparto: *Ni formanĝis <u>la manĝon</u>* ***sur la tablo****. Ni eklegis <u>libron</u>* ***pri aliaj temoj****. Karlo estas <u>simila</u>* ***al mia kuzo****.*

Rolvorteto normale staras antaŭ O-vorto (§4) aŭ io O-vorteca (t.e. O-vorteca vorteto §15 aŭ fremda vorto sen O-finaĵo, §35.2), sed ankaŭ I-verboj (§27.5), subfrazoj (§33.2.3), kvantaj E-vortoj (§24.3) kaj kvantaj E-vortecaj vortetoj (§24.4) povas roli O-vortece, kaj tiam havas iafoje rolvorteton antaŭ si.

Iafoje oni uzas rolvorteton antaŭ loka aŭ tempa E-vorto (§6.1) aŭ E-vorteca vorteto (§14) por pliprecizigi la lokan aŭ tempan signifon: *de ekstere* (= "de la ekstero"), *ĝis malsupre* (= "ĝis la malsupro"), *de matene* (= "de la mateno"), *de tie*, *ĝis tiam*, *por ĉiam* k.s.

### Grupa divido

Tri bazaj rolvortetoj estas aparte klarigitaj:

- *Je* (§12.3.1)
- *De* (§12.3.2)
- *Da* (§12.3.3)

La ceteraj rolvortetoj estas dividitaj en tri grupojn:

- Lokaj rolvortetoj (§12.3.4)
- Direktaj rolvortetoj (§12.3.5)
- Aliaj rolvortetoj (§12.3.6)

Multaj rolvortetoj havas plurajn signifojn, kaj apartenas al du grupoj, aŭ eĉ al ĉiuj tri grupoj. Tiuj rolvortetoj estas troveblaj en tiu grupo, kiu respondas al la ĉefa signifo.

Legu ankaŭ pri:

- Rolvortaĵoj en §12.3.7 = E-vortoj, kiuj kunlaboras kun rolvorteto

- Memstaraj rolvortetoj (§12.3.8)
- Forlaso de rolvorteto (§12.3.9)

Nuanciloj de nombraj kaj kvantaj vortoj (§23.6) estas rolvortetoj kun speciala funkcio antaŭ nombraj kaj kvantaj vortoj.

Krome ekzistas kelkaj neoficialaj rolvortetoj (§19).

### Du rolmontriloj samtempe

Ofte oni uzas ĉe frazparto unu lokan kaj unu direktan rolmontrilon, kiuj kunlaboras por montri moviĝon al aŭ de ia pozicio. Aparte grava estas la uzo de direkta N-finaĵo kune kun lokaj rolvortetoj (§12.2.5). Sed oni uzas ankaŭ ekz. *de* kaj *el* kune kun lokaj rolvortetoj. Ĉe ĉiu loka rolvorteto aperas klarigoj de eventuala uzado kune kun direktaj rolmontriloj.

Ankaŭ *anstataŭ* (§12.3.6.1) kaj *krom* (§12.3.6.3) povas kunlabori kun alia rolmontrilo.

## 12.3.1. *Je*

*Je* estas rolvorteto sen difinita signifo. La origina intenco estis, ke oni uzu *je* en ĉiuj abstraktaj okazoj, por kiuj ne ekzistas alia rolvorteto. Tial en la frua tempo oni uzis *je* tre multe. Nuntempe *je* estas pli malofta, kaj montras precipe horon kaj mezuron, sed ĝi aperas ankaŭ en diversaj aliaj okazoj.

Ĝenerale oni evitu *je*, se pli bona alternativo ekzistas.

Ofte oni povas uzi N-finaĵon anstataŭ *je*, precipe por mezuro (§12.2.3) kaj tempopunkto (§12.2.4).

### Tempopunkto

*Je* plej ofte montras **horon**:

- *Li promesis reveni al ni akurate* ***je la oka horo****.* [Rt.109]
- *Ni prenos la buson* ***je dudek (minutoj) antaŭ la deka (horo)****.*

Legu pli detale pri horoj en §23.8.

Tempopunkta *je* uziĝas iafoje ankaŭ ĉe **nomoj de festoj**:

- ***Je Pasko*** *okazis tie Esperanta festivalo. = En Pasko ....*
- ***Je Kristnasko*** *mi vizitos mian patrinon. = En Kristnasko ...*

La rolvorteto *al* havas ĉe festonomoj specialan signifon (§12.3.5.1).

Ankaŭ aliajn tempopunktojn oni iafoje montras per *je*:

- ***Je la lasta fojo*** *mi vidas lin ĉe vi.* [FE.29]
- *Li revenos hejmen* ***je la plenluno****.* [SS.7] Ĉi tie *je* helpas montri, ke *la plenluno* estu komprenata kiel tempa vorto: = *... je la tempo de la plenluno*. N-finaĵo anstataŭ *je* tute ne funkcius en tiu frazo.
- *Kiam* ***je la vespero*** *la fratinoj tiel mano en mano sin alte levis tra la maro, tiam la malgranda fratino restis tute sola.* [FA1.86] Nun oni ordinare uzas *en la vespero*.

### Mezuro

*Je* povas montri mezuron, sed N-finaĵo estas pli kutima (§12.2.3). Mezura *je* estas tamen sufiĉe ofta ĉe mezuraj priskriboj de *pli* aŭ *malpli*, ĉe tre longaj mezuresprimoj, kaj ĉe vortoj, kiuj ne povas akcepti N-finaĵon:

- *Mi sekve estas **je unu jaro** pli juna, kaj tamen **je kiom** mi estas pli saĝa ol vi!* [M.155] Anstataŭ *je unu jaro* oni povas uzi *unu jaron*. La vorteto *kiom* tamen ne povas ricevi N-finaĵon. Eventuale oni povus diri simple *kiom* (sen *je*), sed *je kiom* estas pli klara.
- *La fratoj rajdis tiel rapide, kiel ili povis, kaj antaŭiĝis al li **je tuta horo**.* [FA3.97] *Je tuta horo* mezuras la distancon inter la rajdantoj. Ĉi tie oni povus ankaŭ uzi *per* (§12.3.6.7).
- *En rapideco ili preterpasis ŝin **je kelke da paŝoj**.* [M.202] *Kelke* ne povas ricevi N-finaĵon.

### Mankaĵo, abundaĵo, sopiraĵo

Ĉe diversaj esprimoj de manko, abundo kaj sopiro, *je* ofte montras tion, kio mankas aŭ abundas, aŭ tion, al kio oni sopiras:

- *Ĝi estas libera **je mankoj**.* Aŭ *... de mankoj*.
- *Eĉ sian patrinon Maaĥa li senigis **je ŝia titolo de reĝino**.* [Rĝ1.15]
- *Abram estis tre riĉa **je brutoj, arĝento, kaj oro**.* [Gn.13]
- *La ĉielo kovriĝis **je nuboj**.* [FA1.85] Aŭ *... per nuboj*.
- *Glaso da vino estas glaso plena **je vino**.* [FE.32] Aŭ *... plena de vino*.
- *Mi sopiras **je mia perdita feliĉo** (aŭ: mian perditan feliĉon).* [FE.29]
- *Kiam ŝi unu fojon gustumis inkon, ŝi fariĝis soifa **je ĝi**, kiel la tigro, kiu eklekis sangon.* [BV.31]

### Korpa aŭ anima stato

*Je* povas pliprecizigi diversajn esprimojn de korpa aŭ anima stato:

- *La laboristoj en fabrikoj* [...] *suferas tre ofte **je kronika konjunktivito**.* [FK.219] Aŭ *... de/pro kronika konjunktivito*.
- *Ŝi gravediĝis **je ĝemeloj**.*
- *La reĝo de la lando malsaniĝis **je tre profunda melankolio**.* [FA3.72]
- *Junuloj ofte tro suferas **je absoluta manko de singardo**.* [H.46]

### Korpoparto tuŝata aŭ malsana

*Je* estas la normala maniero montri korpoparton iel tuŝatan de preno, kapto, malsano k.s.:

- *Li kaptis min **je la brako**. Je la brako* montras mian brakon. Por montri lian brakon (kiun li uzas por kapti min), oni uzu *per*.
- *La hundoj ĵetis sin sur la juĝistojn kaj sur la tutan konsilistaron, kaptis unu **je la piedoj**, alian **je la nazo**, kaj ĵetis ilin.* [FA1.12]
- *La cikonio certe ne malsuprenflugos kaj ne mordos min **je la piedoj**.* [FA1.15]

- *En la tridek-naŭa jaro de sia reĝado Asa malsaniĝis **je siaj piedoj**.* [Kr2.16] La malsano "kaptis" la piedojn.
- *Li estas malsana **je la brusto**.*
- *Li estis lama **je siaj ambaŭ piedoj**.* [Sm2.9]

## Diversaj komplementoj kaj priskriboj

- *Ili ne kredis **je Dio**.* [Ps.78] *Kredi je iu* aŭ *je io* = "kredi, ke tiu aŭ tio vere ekzistas". *Kredi ion*, *al io*, *pri io* = "kredi, ke tio estas vera". *Kredi al iu* = "kredi, ke tiu diras la veron".
- *Li edziĝis **je ŝi**.* [FE.23] Nun oni uzas kutime *al* aŭ *kun*: *Ŝi edziniĝis kun sia kuzo.* [FE.39]
- *La reĝo vetis kun li **je ses berberaj ĉevaloj**.* [H.163] Se li venkos en la veto, li gajnos la ĉevalojn.
- *La pozon duonkuŝan ŝi ŝanĝis **je pozo sida**.* [M.152] = *... al pozo sida, ... en pozon sidan*.
- *Ŝi ne malvolonte ŝanĝus lin **je nova amanto**.* [BV.38] Por ricevaĵo post interŝanĝo oni uzas normale *kontraŭ* (§12.3.4.8).
- *Mi povas kalkuli **je la helpo de multaj geamikoj**.* = *En miaj kalkuloj (= planoj) mi povas inkluzivi la pretecon de multaj geamikoj helpi min.* Oni ankaŭ povas diri *... kalkuli pri la helpo ...*
- ***Je mia miro** la afero sukcesis.* = *La afero sukcesis, kio mirigis min.*
- ***Je Jupitero**! Distrumpetu alarmon!* En ĉi tiaj alvokoj de supera potenco oni uzas ankaŭ *pro* (§12.3.6.11) kaj *per* (§12.3.6.7).

## Objekto

Iuj eksperimente uzas *je* por indiki rektan objekton, kiam la rekta objekto estas io, kio ne povas havi N-finaĵon, aŭ al kio oni malemas aldoni N-finaĵon (§12.2.2), kvazaŭ renversante la regulon, ke oni povas uzi N-finaĵon anstataŭ *je* (§12.2.6): **Li amas **je** <u>Elisabeth</u>.** (= *Li amas Elisabeth-on.*) **Ĉu vi legis **je** <u>"Cent jaroj da soleco"</u>?** (= *Ĉu vi legis la libron "Cent jaroj da soleco"?*) Tio estas nenorma uzo de *je*. Komparu kun la neoficiala objekta rolvorteto **na**° (§19).

### 12.3.2. *De*

La rolvorteto *de* havas tre multajn signifojn. La signifo dependas interalie de tio, al kio *de* rilatas. Pro tiu multsignifeco povas iafoje ekesti malklaraĵoj. Tiam oni povas aldoni diversajn klarigajn esprimojn, aŭ elekti alian rolvorteton.

Iafoje oni uzas *ekde* (§38.3.4) (kun la prefikso EK) kaj *disde* (§38.3.3) (kun la prefikso DIS).

Legu ankaŭ pri elektado inter *de* kaj *da* en §12.3.3.2, kaj pri *de* kiel nuancilo de nombraj kaj kvantaj vortoj en §23.6.

### 12.3.2.1. *De* rilate al verbo

#### Formovo

Kiam *de* rekte rilatas al verbo, ĝi normale montras lokon, kie komenciĝas movo:

- *Mi venas **de la avo**, kaj mi iras nun al la onklo.* [FE.9] La moviĝo komenciĝis ĉe la avo, iris for de li, kaj direktiĝas nun al la onklo.
- *La vento forblovis **de mia kapo** la ĉapon.* [FE.39]
- *Mi saltadis la tutan tagon **de loko** al loko.* [FE.40]
- *Mi volis lin bati, sed li forkuris **de mi**.* [FE.18]

Por klareco oni povas je bezono uzi *for de* aŭ *disde*: *La policо prenis la ŝtelitan monon **for de la rabisto** / **disde la rabisto**.* Se oni dirus: *... la ŝtelitan monon **de la rabisto***, oni povus eble pensi, ke temas pri apartena *de* (§12.3.2.3): "... la ŝtelitan monon, kiu apartenis al la rabisto." Iafoje oni trovas en tiaj okazoj *el de* aŭ *elde*, sed *for de* kaj *disde* esas pli logikaj.

#### Origino

Rilate al verbo, *de* povas montri originon, kio estas simila al formovo:

- ***De la patro** mi ricevis libron, kaj **de la frato** mi ricevis plumon.* [FE.9]
- *Saĝa filo lernas **de la patro**.* [SS.13]
- *La hebreoj estas Izraelidoj, ĉar ili devenas **de Izraelo**.* [FE.36] Izraelo estas ilia prapatro.
- *Donu al mi manĝi **de ĉi tiu ruĝa kuiraĵo**.* [Gn.25]

#### Kaŭzo

Rilate al verbo, *de* povas montri kaŭzon, ĉar kaŭzo similas al origino:

- *Li paliĝis **de timo** kaj poste li ruĝiĝis **de honto**.* [FE.39] = *... pro timo ... pro honto.*
- *Mi eksaltis **de surprizo**.* [FE.40]

Por kaŭzo oni tamen normale uzas *pro* (§12.3.6.11) kaj iafoje *el* (§12.3.5.2).

#### Malsimileco k.t.p.

Rilate al verbo, *de* povas montri malsimilecon, distingon, apartecon, malproksimecon, disecon:

- *Per kio diferencas via amato **de aliaj amatoj*** [...]*?* [AK.5]
- *Mi povus diferencigi la saĝajn **de la malsaĝaj**!* [FA1.107]
- *Kial Vi kaŝas Vian vizaĝon **de mi**?* [Ps.88]
- *Nun mi iom liberiĝis **de la plej urĝaj el miaj kolektiĝintaj laboroj**.* [L1.184]
- *Trankviliĝu **de l' batado**, ho, mia kor'!* [FK.303]

### Tempo

Rilate al verbo, *de* povas montri la komencan momenton de daŭra ago aŭ stato:

Tempa *de* povas stari antaŭ esprimo de tempopunkto:

- *Li laboras* ***de la sesa horo*** *matene.*
- *Ŝi tion kapablas* ***de la naskiĝo****.*
- *Mi sciigas, ke* **de nun** *la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi.* [FE.24]
- ***De la mateno*** *mi nenion manĝis.* [Rz.13] Mi laste manĝis en la mateno. La vorto *mateno* estas ĉi tie uzata por tempopunkto, kvankam mateno ja havas daŭron.

Tempa *de* povas stari ankaŭ antaŭ esprimo de tempodaŭro. Tiam la daŭro de la tempa esprimo kaj la daŭro de la verba ago/stato komenciĝas pli-malpli samtempe:

- *Nur* ***de ses monatoj*** *mi scias la veron.* [BV.84] La sciado komenciĝis en la komenco de la sesmonata periodo.
- *Mi konas lin* ***de longa tempo****.* [FA2.94]
- *Ĝi komencas sian ekzistadon nur* ***de hodiaŭ****.* [OV.111]

Por montri klare, ke temas pri tempo, kaj por pli precize montri la tempan nuancon, oni povas uzi *ekde* aŭ *de post*:

***ekde*** = "de la komenco de"
***de post*** = "de la fino de"

Se temas pri tempopunkto, apenaŭ estas diferenco inter *ekde* kaj *de post*, sed se temas pri tempodaŭro, la diferenco estas ja granda: *de post ŝia vivo* = *ekde ŝia morto*.

- ***Ekde ŝia vizito*** *li ŝajnas multe pli feliĉa.*
- *Mi promesas* ***ekde hodiaŭ*** *ne fumi plu.*
- *Multe ŝanĝiĝis* ***de post tiu tempo****, kiam ni kiel infanoj ludis unu kun la alia.* [FA3.143]
- *Estis tre gaje* ***de post la subiro de la suno*** *en la daŭro de la tuta nokto, dum la plenluno disvastigis lumon preskaŭ tagan.* [FA3.128]
- ***De post la tempo****, pri kiu mi rakontos al vi, pasis jam multe da jaroj.* [FA2.24]

Bedaŭrinde Zamenhof tre ofte uzis *de post* ĉe esprimoj de daŭro ankaŭ en okazoj, en kiuj ne vere temis pri la signifo "de la fino de tiu daŭro", sed simple pri tempa *de*. Iafoje la efektiva senco eĉ estis "de la komenco de la daŭro": ***De post la vespero*** *de la dek-kvara tago de la unua monato manĝu macojn ĝis la vespero de la dudek-unua tago de la monato.* [Er.12] Fakte oni manĝu **ekde** tiu vespero.

Zamenhof ofte skribis *depost* kiel unu vorton: ***Depost la tago****, en kiu Varsovio salutis la novan jaron, pasis ses semajnoj.* [M.132] Nenio pravigas tian kunskribadon, sed se oni tamen uzas ĝin, oni atentu pri la akcento: *dépost*.

Zamenhof uzis ankaŭ *deloke de* kaj *detempe de* por fari distingon inter loka kaj tempa *de*, sed tiuj esprimoj ne estas oftaj:

- *Li mezuris la larĝon* ***deloke de la malsupra pordego*** *ĝis la ekstera rando de la interna korto.* [Jĥ.40]
- *Al tio* [= longa kuŝado en la lito] *ŝi alkutimiĝis* ***detempe de sia infaneco***. [FA4.149]

### 12.3.2.2. *De* rilate al aga O-vorto

#### Subjekto aŭ objekto

*De*-esprimo, kiu priskribas agan O-vorton, normale montras la sencan subjekton (la aganton) aŭ la sencan objekton de la ago:

- *La kanto* ***de la birdoj*** *estas agrabla.* [FE.9] La birdoj kantas. *De* montras subjekton.
- *Du ekbriloj* ***de fulmo*** *trakuris tra la malluma ĉielo.* [FE.40] Fulmo ekbrilis. *De* montras subjekton.
- *Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo* ***de vortaro hispana-germana*** *mi tamen komprenis iom vian leteron.* [FE.34] Vortaro hispana-germana helpis. *De* montras subjekton.
- *Li tuj faris, kion mi volis, kaj mi dankis lin por la tuja plenumo* ***de mia deziro***. [FE.31] Li plenumis mian deziron. *De* montras objekton.
- *Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado* ***de vortoj***. [FE.27] Oni kunligas vortojn. *De* montras objekton.
- *Multe da homoj ne faras malbonon pro timo* ***de mallaŭdo*** *kaj agas bone pro deziro* ***de laŭdo***. [M.153] Ili timas mallaŭdon, kaj deziras laŭdon. *De* montras objektojn.

*De* povas do montri jen sencan subjekton, jen sencan objekton. Normale la signifo estas tute klara el la kunteksto, sed kiam povas esti konfuzo, oni povas uzi diversajn rimedojn por eviti miskomprenon.

Por certigi, ke temas pri **senca subjekto**, oni povas uzi *fare de*:

- *Hodiaŭ posttagmeze okazos akcepto* ***fare de la urbestro***. La urbestro akceptos iun.
- *Okazis vizito al nia klubo* ***fare de eksterlandaj gastoj***.

Iuj mallongigas *fare de* al **far** (§19).

Por certigi, ke temas pri **senca objekto**, Zamenhof iafoje anstataŭ *de* uzis N-finaĵon:

- *Tre grava por la progresado de l' lingvo internacia estas diligenta uzado* ***ĝin*** *en korespondado.* [AD.17] Oni diligente uzu ĝin.

Sed tiun tute logikan solvon oni apenaŭ plu uzas. Anstataŭe oni preferas trovi ian taŭgan rolvorteton:

- *aboni gazeton → abonado* ***al gazeto***
- *admoni iun → admonado* ***al iu***

- *ami iun → amo* ***al iu***
- *demandi iun → demando* ***al iu***
- *ŝirmi ion → ŝirmo* ***al io***
- *taksi ion → taksado* ***pri io***
- *deklari ion → deklaro* ***pri io***
- *moki iun → mokado* ***je iu***
- *penetri ion → penetro* ***en ion***

Kompreneble oni ne hezitu uzi *de*, kiam ne estas risko de malklareco. Rilate al aga O-vorto *de* estas la normala rolmontrilo kaj por subjekto, kaj por objekto.

### Aliaj signifoj

Rilate al aga O-vorto, *de* povas montri ankaŭ formoviĝon, malsimilecon, distingon, komencan tempopunkton k.t.p. (same kiel *de* rilate al verbo, §12.3.2.1):

- *Lia fuĝo* ***de la malamikoj*** *estis kuraĝa ago.*
- *Mia vojaĝo* ***de Parizo*** *al Londono estis tre laciga.*
- *La dioj destinas tre multajn konfuzojn kaj por li preparas skuantan transiron* ***de ĝoj'*** *al doloro.* [IT.68]

Iafoje povas aperi konfuzo kun subjekta aŭ objekta *de*. Tiam oni uzu ian rimedon por klarigi la signifon:

- *Distingado de bono* ***disde malbono*** *ne ĉiam estas facila afero.* La unua *de* montras objekton. Se oni uzus *de* ankaŭ antaŭ *malbono*, la signifo fariĝus tre malklara.
- *Post la falo* ***de la tegmento*** *li estas handikapita.* Oni normale komprenus, ke falis la tegmento (subjekta *de*). Se la signifo estu, ke li falis de la tegmento (formova *de*), oni povus uzi *disde*: *Post la falo* ***disde*** *la tegmento ...* Plej klara kaj preferinda estas tamen: *Post* ***sia*** *falo de la tegmento li estas handikapita.* Tiam *sia* montras la sencan subjekton, kaj *de* nur povas montri formovon.

Ĉe aga O-vorto, *de* povas montri ankaŭ apartenon (kiel ĉe ne-agaj O-vortoj, §12.3.2.3), se la kunteksto permesas:

- *Ni ĉerpu kuraĝon kaj forton por la laboroj* ***de la jaro venonta.*** [OV.392] *= ... la laboroj, kiuj apartenas al la jaro venonta. = ... kiuj okazos en la jaro venonta.*
- *En la ĉerko kuŝis li mem en sia kvieta dormo* ***de la morto.*** [FA1.144] La dormo apartenis al la morto.

### 12.3.2.3. *De* rilate al ne-aga O-vorto

*De*-esprimo, kiu rolas kiel priskribo de ne-aga O-vorto, povas montri multajn diversajn signifojn. Ĝenerale *de* montras ian rilaton inter la priskribata afero kaj la *de*-esprimo.

## Aparteno

Plej ofte *de*-esprimo montras **apartenon** ĉe ne-aga O-vorto. La vorto “aparteno” havas tiam tre vastan signifon. Povas esti posedo, havo, apudeco, alligiteco, parteco, parenceco aŭ alia formo de aparteno:

- *Jen kuŝas la* *__ĉapelo__* ***de la patro***. [FE.8] La ĉapelo apartenas al la patro kiel posedaĵo aŭ havaĵo.
- *Jen estas la* *__kajero__* ***de la juna fraŭlino***. [FE.10] La kajero apartenas al la fraŭlino kiel posedaĵo.
- *La* *__dentoj__* ***de leono*** *estas akraj.* [FE.7] La dentoj apartenas al leono kiel korpopartoj.
- *Li faris ĉion per la dek* *__fingroj__* ***de siaj manoj***. [FE.12] La fingroj apartenas al la manoj kiel korpopartoj.
- *Sur la* *__bordo__* ***de la maro*** *staris amaso da homoj.* [FE.32] La bordo apartenas al la maro, ĉar ĝi troviĝas tuj apud ĝi.
- *Januaro estas la unua* *__monato__* ***de la jaro***. [FE.12] Monatoj estas partoj de jaro.
- *La dudeka (*__*tago*__*)* ***de Februaro estas*** *la kvindek-unua* *__tago__* ***de la jaro***. [FE.12]
- *La kuiristino direktis sin en la internajn* *__partojn__* ***de la loĝejo***. [M.180]
- *La* *__filo__* ***de la reĝo*** [...] *ŝin renkontis.* [FE.21] La filo apartenas al la reĝo kiel parenco.
- *Mi legos* *__poemon__* ***de Zamenhof***. La poemo apartenas al Zamenhof, ĉar li verkis ĝin.
- *Tio verŝajne estas* *__speco__* ***de ĝardena kreskaĵo!*** [FA3.70] La speco apartenas al la klaso “ĝardena kreskaĵo”.
- *Meze sur la muro pendis* *__portreto__* ***de bela juna kaj vivema virino*** [FA2.145] La portreto apartenas al la virino, ĉar ĝi montras ŝian aspekton.
- *__Glaso__* ***de vino*** *estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas por vino.* [FE.32] La glaso apartenas al vino, ĉar ĝi estas uzata por vino.
- *Ŝi estas* *__profesoro__* ***de matematiko***. La profesoreco apartenas al la fako matematiko. Oni povas ankaŭ uzi *pri*.
- *La* *__riĉeco__* ***de tiu ĉi homo*** *estas granda.* [FE.35] La riĉeco apartenas al la homo, ĉar ĝi estas unu el ties ecoj.
- *Tiu ĉi vorto havas* *__signifon__* ***de mezuro***. [FE.32] La signifo apartenas al la ideo “mezuro”.

## Eco

*De* rilate al ne-aga O-vorto povas montri econ:

- *__virino__* ***de meza aĝo*** [M.20] = “mezaĝa virino”.
- *__haroj__* ***de nedifinita koloro*** [M.20] La haroj havis kiel econ nedifinitan koloron.
- *Proksime de ili staris ankoraŭ alia* *__figuro__* ***de triobla grandeco***. [FA2.105] La figuro estis trioble granda.

### Konsisto

*De* rilate al ne-aga O-vorto povas montri konsiston:

- *Li donis al ŝi <u>bukedon</u> **de rozoj**.* La bukedo konsistis el rozoj (*bukedo **da** rozoj* havus iom alian signifon, §12.3.3.2).
- *Tie malsupre kuŝas Germanujo, kiu iam estis kovrita de plej densa <u>reto</u> **de fervojoj kaj kanaloj**.* [FA3.55] La reto konsistas el fervojoj kaj kanaloj.
- *La ŝipoj staris envolvitaj en <u>fumo</u> **de pulvo**.* [FA2.110] La fumo konsistis el pulvo.

### Origino

*De* rilate al ne-aga O-vorto povas montri originon aŭ devenon:

- *Francisko **de Asizo*** = tiu Francisko, kiu devenas de la urbo Asizo = *Francisko **el** (§12.3.5.2) Asizo*

*De la flanko (de iu)*, kaj similaj esprimoj, povas montri originon kun nuanco de respondeco:

- *Mi respondis al li, ke mi tion ĉi ne povas konsenti, ĉar ĝi estus malmodestaĵo **de mia flanko**.* [L1.153] Mi farus malmodestaĵon (pri kiu mi devus respondeci).
- *Vi ne rigardos ja ĝin kiel <u>maldelikatecon</u> **de mia flanko**, se* [...] *mi demandos pri kelkaj neeviteblaj detalaĵoj.* [M.125]

### Mezuro

Ĉe ne-aga O-vorto, *de* povas montri mezuron:

- *La knabo havis la <u>aĝon</u> **de nur ses jaroj**.* [FA4.208] La aĝo estis granda je nur ses jaroj.
- *<u>Vojon</u> **de tri tagoj** ni iros en la dezerton.* [Er.8] La vojo estas tiel longa, ke daŭras tri tagojn iri ĝin.
- *En la <u>daŭro</u> **de kelke da minutoj** mi aŭdis du pafojn.* [FE.40] La daŭro estis longa je kelke da minutoj.

### Formovo, aparteco

Iafoje *de* povas montri formoviĝon aŭ apartecon, kiam ĝi rilatas al ne-aga O-vorto:

- *Rekta linio estas la plej mallonga <u>vojo</u> **de unu punkto** al alia.* La vojo kondukas for de unu punkto.
- *En unuhora <u>distanco</u> **de nia kabano*** [...] *staris la malgranda preĝejo.* [FA1.232] La kabano kaj la preĝejo estas apartaj je unu horo.

### Perverba priskribo de ne-aga O-vorto

Ĉi-antaŭe ĉiuj *de*-esprimoj rilatis al O-vortoj kiel rektaj priskriboj de ili, sed rilate al ne-agaj O-vortoj *de*-esprimo ankaŭ povas aperi kiel perverba priskribo (§25.1.1) de subjekto:

- *Tiu <u>libro</u> estas **de Karlo**. De* montras apartenon, posedon. Pli ofte oni uzas *aparteni + al*: *Tiu libro apartenas al Karlo.*

- *Tiuj du arboj estas* ***de malsamaj specoj****.* *De* montras ecojn.
- *Feliĉa vi estas, ho lando, se via reĝo estas* ***de nobla deveno****.* [Pr.10] *De* montras originon.

### 12.3.2.4. *De* rilate al participo

#### Aktiva participo

Ĉe aktiva participo (§28) kun A-finaĵo aŭ E-finaĵo, *de*-esprimo havas la samajn signifojn kiel ĉe verbo (§12.3.2.1):

- *Ni estis vojaĝantaj* ***de lando*** *al lando. = ... vojaĝis de lando al lando.*
- *Ruĝiĝinte* ***de honto*** *ŝi forkuris. = Post kiam ŝi ruĝiĝis de honto ...*
- *Ne parolu al li antaŭ ol li estos trankviliĝinta* ***de la ŝoko****. = ... antaŭ ol li trankviliĝos de la ŝoko.*

Aktivaj participoj kun O-finaĵo (§28.3) montras personon (iafoje aĵon), kiu faras, faris aŭ faros agon. Ĉe tiaj vortoj *de*-esprimo ĉiam montras la sencan objekton de la ago:

- *Venu, ni atendas vin, Savonto* ***de la mondo****.* [FE.22] La savanto savos la mondon. *De* montras objekton.
- *La konfesantoj* ***de unu religio*** *estas samreligianoj.* [FE.37] Ili konfesas unu (saman) religion.
- *Ĉiuj loĝantoj* ***de regno*** *estas regnanoj.* [FE.37] Ili loĝas la regnon.

#### Pasiva participo

Rilate al pasiva participo (§29.1), *de* plej ofte montras sencan subjekton, aganton:

- *Ŝi estas amata* ***de ĉiuj****.* [FG.54] Ĉiuj amas ŝin.
- *Tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte aĉetata* ***de mi****.* [FE.25] Mi aĉetas la komercaĵon.
- *La surtuto estas aĉetita* ***de mi****, sekve ĝi apartenas al mi.* [FE.25] Mi aĉetis la surtuton.
- *La ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj* ***de mi****.* [FE.25] Mi ne pagos la ŝuldojn.
- *Li staras kvazaŭ frapita* ***de fulmo****.* [Rt.92] Ŝajnis, kvazaŭ fulmo frapis lin.
- *La montoj estis kovritaj* ***de neĝo****.* [FA1.211] Neĝo kovris la montojn.
- *La tempo fluis ne rimarkate* ***de ili****.* [FA2.146] Ili ne rimarkis la fluon de la tempo.
- *Ili estas konatoj* ***de mi****.* Ili estas personoj, kiujn mi konas.

Oni ankaŭ povas uzi *fare de*, se oni volas tre klare montri, ke temas pri aganto: *La infano estis forprenita* ***fare de la patrino****.* Sed tio malofte estas necesa ĉe pasivaj participoj.

Se oni volas uzi alisignifan *de*-esprimon ĉe pasiva participo, oni ordinare devas tion montri klare per *disde*, *for de*, *el de*, *ekde* aŭ simile:

- *La infano estis forprenita* ***disde la patrino***. Oni forprenis ĝin de la patrino.
- *Tiuj riĉaĵoj estas hereditaj* ***el de ŝia avo***. Se oni uzus simplan *de*, la senco estus, ke ŝia avo heredis la riĉaĵojn, sed la intencita senco estas, ke iu heredis ilin de li. Iafoje oni vidas *elde* anstataŭ la preferinda duvorta formo *el de*.
- *La oficejo estas malfermita* ***ekde la naŭa horo***. Ĉi tie ankaŭ simpla *de* bone funkcius, ĉar apenaŭ estus eble miskompreni.

Kiam la aganto estas spertanto (sentanto), oni ofte uzas *al* anstataŭ *de* (§12.3.5.1), precipe ĉe la participo *konata*.

Sed se la kunteksto malebligas miskomprenon, simpla *de* povas esti uzata ĉe pasiva participo ankaŭ por alia signifo ol senca subjekto:

- *Tiam alvenis birdoj nesciate* ***de kie***. [FA3.29] *De* montras originon.
- *Naŭ deprenite* ***de dudek*** *estas dek-unu.* [M.116] *De* montras formovon.
- *La hospitalo estas apartigita* ***de la strato*** *per sufiĉe alta krado* [FA1.128] *De* montras apartigon. *Disde la strato* estus pli klara ĉi tie.

### 12.3.2.5. *De* rilate al A-vorto aŭ E-vorto

*De*-esprimo, kiu rilatas al A-vorto aŭ E-vorto, povas havi diversajn el tiuj signifoj, kiujn *de* povas havi ĉe verboj (§12.3.2.1), ĉe agaj O-vortoj (§12.3.2.2) kaj ĉe ne-agaj O-vortoj (§12.3.2.3):

- *Mia projekto estis tre multe diferenca* ***de tiu ideo pri plibonigoj, kiun Vi havas***. [L1.330] La projekto diferencas de tiu ideo. *De* montras apartecon.
- *Ĉu ankaŭ ĉiuj viroj devas posedi ian perfektecon, por akiri al si staton liberan* ***de grandaj suferoj kaj mizero***. [M.35] *De* montras apartecon.
- *Bona estas Romo, sed tro malproksima* ***de nia domo***. [PE.751] *De* montras apartecon.
- *Mi, ebria* ***de feliĉo***, *alkroĉiĝis al lia kolo.* [Rt.104] *De* montras kaŭzon.
- *Niaj okuloj estis plenaj* ***de larmoj***. [Rt.46] *De* montras kaŭzon kaj enhavon.
- *Tio estis prudenta* ***de la flanko de la jura konsilisto***. [FA1.123] *De* montras originon.
- *La marŝo daŭris sep horojn ekskluzive* ***de la paŭzoj***. = *... ekskluzivante la paŭzojn.* La marŝodaŭro ne inkluzivis la paŭzojn. *De* montras sencan objekton. Oni ankaŭ povus uzi la finaĵon N: *... ekskluzive la paŭzojn.*
- *Li scias ĉiujn latinidajn lingvojn escepte* ***de la rumana***. = *... se oni esceptas la rumanan. De* montras sencan objekton. Oni ankaŭ povas diri *... escepte la rumanan.*
- *Ĉiuj aliaj loĝantoj de la lando staris ĉirkaŭe* ***de la palaco***. [FA3.97] = *... en la ĉirkaŭo de la palaco. De* montras apartenon, apudecon.
- *Mi salutas vin nome* ***de mia frato***. = *... en la nomo de mia frato. De* montras apartenon, posedon.

Ĉe participoj (§12.3.2.4) *de* tamen havas pli precize limigitajn signifojn.

Ofte E-vorto + *de* formas esprimon, rolvortaĵon (§12.3.7), kiun oni uzas kvazaŭ unu rolvorteton: *dekstre de*, *escepte de*, *fare de*, *fine de*, *inkluzive de*, *interne de*, *ene de*, *kaze de*, *kaŭze de*, *meze de*, *norde de*, *sekve de*, *supre de* k.t.p.

### 12.3.2.6. *De* rilate al vorteto

#### *For*

*De* rilate al *for* (§14.1.3) montras formoviĝon aŭ apartecon:

- *For* ***de tie ĉi****!* [FE.26]
- *For* ***de miaj okuloj****!* [Rt.29]
- *Ŝi demetis la tukon for* ***de la kapo****.* [M.169]
- *Grandaj vojaĝoj kaj longa restado for* ***de mia hejmo*** *estas por mi afero tre malfacila.* [L2.236]

#### Pronomoj, pronomecaj vortetoj

*De*-esprimoj povas priskribi personajn pronomojn (§11.1) kaj pronomecajn vortetojn (§15), normale pere de verbo, sed iafoje rekte. La signifoj estas la samaj kiel ĉe ne-aga O-vorto (§12.3.2.3):

- *Li estas* ***de meza kresko****.* [FE.33] Eco.
- *Ĝi estas* ***de mi****.* Aparteno, posedo. Pli ofte oni diras: *Ĝi estas mia. Ĝi apartenas al mi.*
- *Ili estas* ***de Francujo****.* Deveno.
- *Tiuj estas* ***de ŝi****.* Aparteno, posedo.
- *Ambaŭ estas* ***de Japanujo****.* Deveno.
- *Mi preferas tiun* ***de Karlo****.* Posedo.

#### Tabelvortoj je OM

*De*-esprimoj povas ankaŭ priskribi tabelvortojn je OM (§14.3.3) montrante konsiston:

- *Mi volus scii, kiom* ***de la ŝtofo*** *ili jam pretigis!* [FA1.108] La *de*-esprimo montras, el kio konsistas la kvanto pridemandata.

### 12.3.3. *Da*

#### 12.3.3.1. *Da* — bazaj reguloj

La rolvorteto *da* ligas kvantan aŭ mezuran esprimon al O-vorta frazparto, kiu montras ion "substancecan" (ion nelimigitan kaj nedifinitan). La kvant-esprimo montras, kiom estas de la substanceca afero:

| kvanto | | "substanco" |
|---|---|---|
| *unu kilogramo* | **da** | *pano* |
| *litro* | **da** | *lakto* |
| *skatolo* | **da** | *rizo* |
| *amason* | **da** | *komencantoj* |
| *du milionoj* | **da** | *rubloj* |
| *iom* | **da** | *valizoj* |
| *tiom* | **da** | *feliĉo* |
| *multe* | **da** | *problemoj* |

- *Ŝi aĉetis faskon **da ligno**, iom **da nigra pano**, [iom] **da malbonspeca faruno** kaj [iom] **da lakto**.* M.182 La vortoj *fasko* kaj *iom* montras kvantojn. La *da*-esprimoj montras, el kio konsistas la diversaj kvantoj.
- *Por ĉiu aĉetita funto **da teo** tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton **da sukero**.* FE.31
- *Ha, Dio nin gardu! Kia grandega amaso **da oro**!* FA1.7
- *Sur la arbo sin trovis multe (aŭ multo) **da birdoj**.* FE.32
- *Mi neniam prenas kun mi multon **da pakaĵo**.* FE.35
- *La riĉulo havas multe **da mono**.* FE.37
- *Li havas pli **da mono**, ol li povas kalkuli.* PE.655
- *Nur nun ŝi eksentis, [...] kiom **da fortoj** forprenis de ŝi la malvarmo.* M.148
- *Tiu ĉi rivero havas ducent kilometrojn **da longo**.* FE.32

*Da*-esprimo neniam estas komplemento de ĉefverbo, sed **ĉiam rekta priskribo** de ĉefvorto. Oni ne povas uzi memstarajn *da*-esprimojn, ekz.: **Sur la tablo troviĝas **da butero**.** **Ŝi aĉetis **da faruno**.** Oni devas diri ekz.: *Sur la tablo troviĝas iom **da butero**. Ŝi aĉetis iom **da faruno***. (Plej ofte oni tamen diru simple: *Sur la tablo troviĝas butero. Ŝi aĉetis farunon.*)

#### Nombrovortoj kaj *da*-esprimoj

Nombraj vortetoj (§23.1.2) aperas normale **sen *da*** kiel rekta priskribo de ĉefvorto:

- *Tie loĝas **du** esperantistoj.*
- *Mi havas **cent** pomojn.*
- *Tiu ĉi vilaĝo havas **du mil** loĝantojn.*

Nombrovortoj kun O-finaĵo (§23.2) kiel *miliono*, *miliardo*, *deko* kaj *cento* tamen bezonas *da*. Ili aperas kiel ĉefvorto kun *da*-esprimo kiel priskribo:

- *Mi havas centon **da pomoj**.* FE.14
- *Tiu ĉi urbo havas milionon **da loĝantoj**.* FE.14
- *Li ĝin forblovas por dudeko **da rubloj**.* Rz.22

### Ne uzu N-finaĵon post *da*

Post *da* oni ne povas uzi N-finaĵon, ĉar *da*-esprimo neniam estas mem objekto. La kvanta esprimo antaŭ *da* tamen povas esti objekto: *Li portas multon **da valizoj**.*

Sed la kvanta esprimo ofte estas kvanta E-vorto (§24.3) aŭ kvanta vorteto (§24.4), kiu ne povas ricevi N-finaĵon, eĉ kiam ĝi rolas kiel objekto:

- *La riĉulo havas multe **da mono**.* FE.37 = *La riĉulo havas multon **da mono**.* (Nepre ne: **La riĉulo havas multe da mono**n**.**)
- *Kiom **da pano** vi volas?* = *Kiel grandan kvanton **da pano** vi volas?* (Nepre ne: **Kiom da pano**n** vi volas?**)

### 12.3.3.2. *Da* — detalaj reguloj

Estas du kondiĉoj por uzi *da*:

- La **antaŭa esprimo** devas montri **kvanton**. Ĝi povu esti respondo al la demando "kiom?".
- La **posta esprimo** devas esti laŭsence **nelimigita** kaj **nedifinita**.

Alie oni elektu alian rolvorteton, plej ofte *de* (§12.3.2), sed ankaŭ ekz. *el* (§12.3.5.2) kaj *je* (§12.3.1) povas uziĝi, depende de la kunteksto.

Se tute ne temas pri kvanto, mezuro aŭ nombro, sed ekz. pri speco, oni ne uzu *da*, sed ordinare *de* (§12.3.2):

- *Ni manĝis specon **de fiŝo**.* La vorto *speco* neniam povas esprimi kvanton, mezuron aŭ nombron. Do neniam diru **speco da ...**.
- *Ĉe ni estas manko **de akvo**.* La vorto *manko* neniam esprimas kvanton, mezuron aŭ nombron.
- *Pro perdo **de kuraĝo** ili ne venis.* La vorto *perdo* neniam esprimas kvanton, mezuron aŭ nombron.

Neniam uzu *da* rilate al A-vorto, eĉ se ĝi esprimas kvanton, mezuron aŭ nombron:

- *Ni renkontis **multajn homojn**.* (= *Ni renkontis multe/multon **da homoj**.*) Kvantaj A-vortoj, *multa(j)*, *kelka(j)*, *pluraj* k.a., ligiĝas rekte al la mezurata O-vorto kiel rekta priskribo sen *da*.
- *La botelo estas plena **de/je akvo**.* La A-vorto *plena* ĉiuokaze ne esprimas kvanton, sed staton. Ankaŭ la E-vorto *plene* ne esprimas kvanton: *Tie estas plene **de/je homoj**.* Neniam diru **plena da ...** aŭ **plene da ...**.
- *Tie ni trovis ĉambron plenan **de/je rubaĵoj**.*

Frazparto kun difinilo (§9) (*la*, *tiu*, *ĉiu*, poseda pronomo ...) estas difinita, do limigita kaj individueca (ne-substanceca). Sekve oni ne uzu *da* antaŭ tia frazparto, sed anstataŭe *de* aŭ *el*:

- *Ni manĝis* <u>*iom*</u> ***de/el la pano***.
- *Ili aĉetis* <u>*kelkajn botelojn*</u> ***de/el tiuj vinoj***.

Persona pronomo (§11.1) ordinare montras unu aŭ plurajn difinitajn individuojn. Tial oni ne uzu *da* antaŭ persona pronomo, sed anstataŭe *de* aŭ *el*:

- *Ni manĝis* <u>*iom*</u> ***de/el ĝi***.
- *Ili aĉetis* <u>*kelkajn botelojn*</u> ***de/el ili***.

Se la kvanto aŭ nombro jam estas montrata per nombra vorteto (§23.1) aŭ A-vorto, oni ne uzu *da*, sed *de* aŭ *el*:

- *Ŝi pagis* <u>*kotizon*</u> ***de cent eŭroj***. La vorto *kotizo* ĉiuokaze ne esprimas kvanton. Sed oni ja povas diri *ŝi pagis* <u>*cent eŭrojn*</u> ***da kotizo***.
- *Ni gustumis* <u>*tre multe*</u> ***de unu vino***.
- *Ili manĝis* <u>*ĉiom*</u> ***de/el tuta bovo***.
- *Li trinkis* <u>*iom*</u> ***de/el kelkaj bieroj***.

Se unu-nombra O-vorto jam per si mem esprimas klare limigitan kvanton, oni ne uzu *da*:

- *Unu tago estas* <u>*tricent-sesdek-kvinono*</u> *aŭ* <u>*tricent-sesdek-sesono*</u> ***de jaro***. [FE.14] *Jaro* montras per si mem klare limigitan tempon.
- *Ili fortranĉis* <u>*duonon*</u> ***de centimetro***.

Iuj vortoj foje esprimas kvanton, foje ion alian. La intencita senco decidas, ĉu oni uzu *da* aŭ alian rolvorteton:

- <u>*Glaso*</u> ***de vino*** *estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas por vino;* <u>*glaso*</u> ***da vino*** *estas glaso plena je vino.* [FE.32] *Glaso* jen montras individuaĵon, jen kvanton. (En la praktiko oni diras preskaŭ ĉiam *vinglaso* anstataŭ *glaso de vino*.)
- *Ili konstruis* <u>*grandan reton*</u> ***da/de komputiloj***. Se la esprimo *grandan reton* montras, kiom da komputiloj estis, tiam oni diru *da komputiloj*. Sed se *grandan reton* montras, kiamaniere la komputiloj interrilatas (en la formo de granda reto), tiam oni diru *de komputiloj*.

La uzo de *da* do dependas de tio, kion la parolanto volas diri. Por helpi sin, oni povas imagi demandon, al kiu la frazo povus respondi:

- ***Kiom*** *da soldatoj estis? – Estis grupo* ***da soldatoj****!*
- ***Kia*** *grupo ĝi estas? – Ĝi estas grupo* ***de soldatoj****!*
- ***Kiom*** *da rozoj vi volas? – Mi volas bukedon* ***da rozoj****!*
- ***Kian*** *bukedon vi volas? – Mi volas bukedon* ***de rozoj****!*

Ofte estas necese atenti, ĉu la posta vorto estas pli grava (→ *da*), aŭ la antaŭa vorto (→ *de*). *A* ***da*** *B* estas *B (en A-kvanto)*, dum *A* ***de*** *B* estas *A (kiu iel rilatas al B)*: *Grupo* ***da*** *soldatoj* estas *soldatoj* (en grupa kvanto). *Grupo*

***de*** *soldatoj* estas *grupo* (kiu konsistas el soldatoj). *Bukedo* ***da*** *rozoj* estas *rozoj* (en bukeda kvanto). *Bukedo* ***de*** *rozoj* (aŭ *bukedo* ***el*** *rozoj*) estas *bukedo* (kiu konsistas el rozoj).

En esprimoj kun la vorto *nombro*, oni povas heziti inter *da* kaj *de*:

- *La granda nombro* ***da*** *novaj partoprenantoj ĝojigis min. = La multaj novaj partoprenantoj ĝojigis min. Ili ĝojigis min.*
- *La granda nombro* ***de*** *novaj partoprenantoj ĝojigis min. = La nombro ĝojigis min. Ĝi ĝojigis min.*

## Ekzemploj kun *da, de* kaj *el*

- *Alportu al mi* <u>*metron*</u> ***da nigra drapo*** *(*<u>*Metro*</u> ***de drapo*** *signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo).* [FE.32] *Metro* estas jen kvanto, jen unu metron longa mezurilo.
- *Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj paŝtas sin grandaj brutaroj, precipe* <u>*aroj*</u> ***da bellanaj ŝafoj***. [FE.34] *Aroj* ĉi tie montras kvanton.
- *Antaŭ nia militistaro staris* <u>*granda serio*</u> ***da pafilegoj***. [FE.38] *Granda serio* ĉi tie montras kvanton.
- *Tri estas* <u>*duono*</u> ***de ses***. [FE.14] *Ses* estas preciza limigita nombro.
- *Mi volus scii,* <u>*kiom*</u> ***de la ŝtofo*** *ili jam pretigis.* [FA1.108] *La ŝtofo* havas *la*, kaj montras do individuan limigitan ŝtofon.
- *La pastro prenos* <u>*iom*</u> ***el la sango***. [Lv.4] *La sango* havas *la*, kaj montras individuan sangokvanton. Zamenhof tial elektis *el*. Oni povus ankaŭ uzi *de*, sed en la Biblio *el* estas konsekvence uzata en tiaj ĉi frazoj.
- *Oni ne devas restigi* <u>*iom*</u> ***el ĝi*** *ĝis la mateno.* [Lv.7] *Ĝi* montras individuaĵon.
- *Tie malsupre kuŝas Germanujo, kiu iam estis kovrita de* <u>*plej densa reto*</u> ***de fervojoj kaj kanaloj***. [FA3.55] *Plej densa reto* montras la aspekton, ne la kvanton, de la fervojoj kaj kanaloj.
- *Mi citos al vi* <u>*pecon*</u> ***de unu el tiuj leteroj***. *Peco* ĉi tie montras aŭ individuaĵon aŭ kvanton, sed la posta esprimo estas limigita per la vorto *unu*, tial oni devas uzi *de*.
- *Marta* [...] *rigardis la* <u>*pecon*</u> ***da ĉielo*** *videblan tra la malgranda fenestro.* [M.133] Ĉi tie *peco* montras kvanton.
- <u>*Radio*</u> ***da varma sango*** *elŝprucis trans la glacion kiel fontano.* [FA1.182] *Radio* normale ne montras kvanton, sed pro *da* ĝi ricevas tian signifon tie ĉi.
- *En ilia profundo* [= en ŝiaj okuloj] *estis* <u>*iom*</u> ***da tia kunsento, kun kia homo matura,*** [...] ***rigardas naivan infanon***. [M.35] Tabelvortoj je A montras specon, ion nelimigitan.

### 12.3.3.3. *Da* — nekutimaj uzoj

#### Memstaraj *da*-esprimoj

Normale *da*-esprimo staras tuj post sia kvantesprimo, sed okaze *da*-esprimo staras sola. Tiam normale la kvantesprimo troviĝas en alia loko de la frazo (nekutima vortordo). Iafoje tamen la kvanta vorto estas subkomprenata:

- ***Da reĝidinoj** estis suficê multe.* [FA1.27] = *Estis suficê multe **da reĝidinoj**.*
- ***Da ŝafoj kaj bovoj** li havis multe.* [Kr2.32] = *Li havis multe **da ŝafoj kaj bovoj**.*
- ***Da homoj piedirantaj** estas malpli, preskaŭ neniom.* [M.210] = *Estas malpli, preskaŭ neniom, **da homoj piedirantaj**.*
- ***Da pulvo** ni havas kiom vi volas.* [Rt.66] = *Ni havas tiom **da pulvo**, kiom vi volas.*

#### Specialaj okazoj

Ordinare oni ne uzas *da* antaŭ frazparto kun difinilo, *la*, *tiu(j)*, *ĉiu(j)* aŭ poseda pronomo, ĉar tia frazparto ordinare montras ion limigitan kaj individuan. Ankaŭ personaj pronomoj normale reprezentas difinitajn individuojn: *ili* = *la viroj*, *la knaboj* aŭ simile; *ĝi* = *la tablo*, *la infano*, *la muziko* aŭ simile. Tamen iafoje tia frazparto aŭ persona pronomo tamen montras specon. Tiam, tute logike, oni povas uzi *da*, ĉar la uzo de *da* ne vere dependas de formalaj reguloj, sed de la efektiva senco:

- *Provajn numerojn ni elsendos, kiam ni havos sufiĉan nombron **da ili**.* [OV.160] *Ili* reprezentas ĉi tie *provaj numeroj*, ne ***la** provaj numeroj*. *Ili* estas do ĉi tie nelimigita, kaj *da* estas ĝusta. Ĉi tia uzo de persona pronomo pri nedifinita, nelimigita, afero estas tamen sufiĉe malofta. Plej ofte oni do ne uzas *da* antaŭ personaj pronomoj.
- *Kvar metroj **da tiu ĉi ŝtofo** kostas naŭ frankojn.* [FE.14] Ĉi tie temas pri ŝtofospeco (nelimigita afero). Per *tiu ĉi* oni almontras specimenon de tiu ŝtofospeco. La specimeno estas limigita, sed oni parolas pri la ŝtofospeco ĝenerale, ne nur pri la specimeno. Tial *da* estas taŭga. Oni povas ankaŭ renversi la klarigon, dirante, ke ĝuste la ĉeesto de *da* devigas kompreni la frazparton *tiu ĉi ŝtofo* kiel specan esprimon malgraŭ la difinilo *tiu*. (Efektive *tiu* similas ĉi tie al *tia* aŭ *tiuspeca*, kaj oni povas eble opinii, ke *... da tia ĉi ŝtofo* estas preferinda.)
- *Ekzistas cetere multe **da miaj verkoj*** [Rz.46] Ĉi tie *miaj verkoj* ne signifas *la verkoj, kiujn mi kreis*, sed *verkoj, kiujn mi kreis*, do sen difina senco. Posedaj pronomoj ne ĉiam esprimas difinitecon. (§9.2)

## Malnova uzo

En la komenca tempo la reguloj por *da* estis ankoraŭ nefiksitaj. Tial oni povas en malnovaj tekstoj trovi ekzemplojn, kiuj ne sekvas la regulojn pri *da* en *PMEG*: *La nigra maro levis* <u>*la grandajn pecegojn*</u> ***da glacio*** *alte supren kaj briligis ilin en la forta fulmado.* FA1.85 Pli bone: *la grandajn pecegojn* ***de*** *glacio*. Ne temas pri tio, kiom da glacio estis, sed pli vere pri tio, el kio konsistis la grandaj pecegoj. En la sama alineo estis ankaŭ la jena frazo kun *de*: *Ĉirkaŭe naĝis* <u>*grandaj montoj*</u> ***de glacio****, el kiuj* [...] *ĉiu elrigardis* [= aspektis] *kiel perlo.* FA1.85

## "*Da*-ismo"

En parola Esperanto disvastiĝis malĝusta maniero uzi *da*, kiun oni povas nomi "*da*-ismo". En tiu uzo *da* ne havas postan esprimon, kies rolon ĝi povus montri. *Da* ĉesis esti rolmontrilo. Tiam *da* nur montras, ke la antaŭa esprimo estas kvanta:

- **Mi havas multe* ***da****.**
- **Kiom* ***da*** *vi volas?** *Da* ĉi tie **ne** rilatas al la posta *vi*.
- **Ili kunportis tiom* ***da****, ke ĉiu povis ricevi iom* ***da****.**

Iuj diras, ke temas pri ordinara subkompreno:

- *Mi havas multe* ***da mono****.* → **Mi havas multe* ***da****.**
- *Kiom* ***da viando*** *vi volas?* → **Kiom* ***da*** *vi volas?**

En tia subkomprenado oni tamen normale forlasas ankaŭ la rolvorteton: *Li estas instruisto* ***de lingvoj****.* → *Li estas instruisto.* Ne: **Li estas instruisto* ***de****.** Tial, se oni volas forlasi la vorton post *da*, tiam oni forlasu ankaŭ *da*.

Oni do diru simple: *Mi havas multe. Kiom vi volas? Ili kunportis tiom, ke ĉiu povis ricevi iom.* Vortoj kiel *multe*, *tiom* kaj *iom* estas kvantaj per si mem. Ili neniel bezonas *da* por povi esprimi kvantan signifon. Nur se oni volas montri, el kio konsistas la kvanto, oni uzu *da*, sed tiam nepre kun frazparto poste.

Eventuale oni povus akcepti esceptokazajn uzojn de memstara *da* post vortoj, kiuj ne estas per si mem kvantaj, se tio helpas eviti miskomprenon. Ekz.: *Mi volas skatolon* ***da****. = Mi volas tiom, kiom enhavas skatolo. / Mi volas skatolon. = Mi volas tian ujon.* Sed konstanta uzo de memstara *da* post ĉiu kvantesprima vorto nur pezigas kaj malbeligas la lingvon. En la skriba lingvo memstara *da* apenaŭ aperas, ĉe bonaj aŭtoroj neniam.

> **Noto:** Tamen indas mencii la poemon "La Velŝipo Magdalena" de *William Auld* (sendube unu el la "bonaj aŭtoroj"), en kiu aperas (en versio de la poemo verkita aparte por la muzikgrupo Kajto) la *da*-ismaĵo "trio da" en la buŝoj de krudaj maristoj, de kiuj oni atendas nekleran kaj nenorman lingvaĵon.

Ŝajnas, ke *da*-ismo estas simptomo de pli profunda miskompreno. Uzo de memstara *da* montras, ke oni pensas, ke *da* apartenas al la antaŭa esprimo, ne al la posta. Tiam la posta esprimo estas ĉefvorto: *mi havas* ***multe da*** <u>*mono*</u>. Konsekvence oni volas uzi N-finaĵon en tiaj ĉi frazoj, ĉar *mono* estas nun objekto: **mi havas* ***multe da*** <u>*mono**n***</u>*** (simile al: *mi havas* ***multan*** <u>*mono**n***</u>). Kaj efektive frazoj kiel **mi havas multe da mono**n**** relative ofte

aperas. Kulpas pri tio ĉi interalie multaj lernolibroj, kiuj instruas *da* kvazaŭ ĝi apartenus ĉefe al la antaŭa vorto. La *da*-ismo eble rilatas al la *tiom-kiom*-ismo (§24.5) – ĉiama uzado de *kiom* kaj *tiom* anstataŭ *kiel* kaj *tiel* por montri gradojn. Eble por la *tiom-kiom*-istoj (kiuj ofte estas ankaŭ *da*-istoj) *kiom* kaj *tiom* estas unuavice gradaj, kaj tial ili eble sentas, ke oni devas aldoni *da* por montri, ke temas pri kvanta signifo.

Iuj opinias, ke tia ĉi uzo de *kiom/tiom da* sen posta O-vorto estas motivata de deziro eviti misaŭdon de *kiom* aŭ *tiom* kiel *kion* aŭ *tion* (ĉar *da* estus sensenca post *kion* aŭ *tion*). Tio estas respektinda motivo, sed laŭ mi multe pli taŭga solvo estas uzi *kiel/tiel multe* (aŭ *kiom/tiom multe*), se sola *kiom* aŭ *tiom* povus esti misaŭdata. Tia elturniĝo estas pli klara kaj tute laŭregula. Anstataŭ *neniom* taŭgas *nenia kvanto*, se estas risko de misaŭdo. Simile *ia kvanto* ofte povas laŭbezone anstataŭi la vorteton *iom*. *Ĉiom* entute aperas nur tre malofte, kaj tiam ĝi laŭsence nur marĝene distingiĝas disde *ĉio(n)* en tiaj realaj uzoj, en kiuj iuj emus uzi *ĉiom da* sen posta O-vorto. Laŭbezone tamen *la tuta kvanto* estas taŭga kaj klara anstataŭaĵo.

### 12.3.4. Lokaj rolvortetoj

Lokaj rolvortetoj montras pozicion en spaco, sur surfaco, sur linio, kaj simile. Pluraj el ili estas uzataj ankaŭ pri tempo, ĉar oni ofte bildigas al si tempon kiel linion. Ankaŭ aliajn ideojn oni montras figure kiel poziciojn. Ĉe iuj lokaj rolvortetoj la loka signifo estas la baza signifo, dum aliaj uzoj povas esti pli oftaj en la praktiko.

#### 12.3.4.1. *Antaŭ* (kaj *malantaŭ*)

*Antaŭ* montras pozicion ĉe tiu flanko, kiu estas plej proksima al la parolanto, aŭ ĉe tiu flanko, kiu estas la plej grava, la ĉefa. La antaŭa flanko de homo aŭ besto estas la flanko de la vizaĝo kaj okuloj. La preciza senco de *antaŭ* do dependas de la perspektivo de la parolanto:

- ***Antaŭ la domo** staras arbo.* FE.8 = *Ĉe la antaŭa flanko de la domo ...*
- ***Vespere antaŭ la pordo** haltis veturilo.* FA2.148
- *Ni nenion povis vidi eĉ **antaŭ nia nazo**.* FE.33
- ***Antaŭ nia militistaro** staris granda serio da pafilegoj.* FE.38
- *Oni metis **antaŭ mi** manĝilaron.* FE.34

#### Pozicio en sinsekvo

*Antaŭ* povas ankaŭ montri pozicion en ia sinsekvo, pozicion, kiun sekvas alia. Ofte ĉeestas tiam ankaŭ pure loka signifo:

- *Mi iras **antaŭ vi**.* FA2.64 Mi iras unue, vi sekvos post mi.
- *M estas **antaŭ N** en la alfabeto.*

Sinsekva *antaŭ* estas tre simila al tempa *antaŭ*.

## Figura uzo

*Antaŭ* ofte montras ĉeeston aŭ influon de io grava:

- *Li tute ne sentis timon* ***antaŭ ŝi****.* [FA2.55] *= ... kiam ŝi ĉeestis.*
- *Mi ne kaŝis* ***antaŭ li*** *eĉ la plej malgrandan cirkonstancon.* [Rt.21] *= ... kaŝis, kiam li ĉeestis ...*
- *Ili ne havis plu kuraĝon* ***antaŭ la Izraelidoj****.* [Js.5]
- *Mi estas eldonisto, respondeca* ***antaŭ la publiko****.* [M.135]
- *La dialektoj kaj provincialismoj iom post iom perdiĝis* ***antaŭ la fortiĝanta komuna literatura lingvo****.* [AD.9]

*Antaŭ* povas montri estontecon, kiu kvazaŭ staras antaŭ iu:

- *Ili havis ja* ***antaŭ si*** *grandan vojaĝon.* [FA1.209]

*Antaŭ* povas montri pozicion pli altan en graveco aŭ rango:

- *La pliboneco de Esperanto* ***antaŭ Volapük*** *estas tiel frapante granda, ke ĝi falas al ĉiu en la okulojn tuj de la unua rigardo.* [FK.284] Se oni metus la lingvojn en ordo de boneco, Esperanto starus antaŭ Volapük.
- *Esperanto devis esti* ***antaŭ ĉio*** *eksterordinare facila.* [L1.245] Facileco estis la plej grava postulo.
- *Li ne atentas la vizaĝon de princoj, kaj ne preferas riĉulon* ***antaŭ malriĉulo****.* [Ij.34]

### *Antaŭ* + direktaj rolmontriloj

- *La bona virino metis* ***antaŭ lin*** *la plej bonajn manĝaĵojn, kiujn ŝi havis.* [FA1.15] *= ... al pozicio antaŭ li ...*
- *Ŝi venis* ***antaŭ la reĝon*** *kaj stariĝis antaŭ la reĝo.* [Rĝ1.1] *= Ŝi venis al pozicio antaŭ la reĝo kaj stariĝis tie.*
- *La cigno klinis la kapon kaj falis malrapide* ***antaŭ iliajn piedojn****, kie ĝi restis senviva.* [FA1.68]
- *Marta forprenis la manplaton* ***de antaŭ la okuloj****.* [M.159] *= ... de pozicio antaŭ la okuloj.* Ofte sufiĉas simpla *de* anstataŭ *de antaŭ*.
- *Mi jam ĝis nun... trovus tiun, kiu malaperis* ***de antaŭ miaj okuloj****.* [M.142]

Ofte *antaŭ* aperas sen direkta N-finaĵo kvankam temas klare pri movo. La klarigo estas, ke oni rigardas ion alian kiel efektivan celon de la movo:

- *Jadvinjo* [...] *alŝovis al la tablo oportunan brakseĝon kaj metis* ***antaŭ ĝi*** *kelke da libroj kaj sufiĉe grandan nombron da dikaj kajeroj.* [M.43] *= ... metis* ***sur la tablon*** *antaŭ ĝi ...* La efektiva celo de la metado, la tablo, estas subkomprenata. Sed ankaŭ la brakseĝo (= *ĝi*) povas esti rigardata kiel celo, kaj oni tute bone povas uzi *metis antaŭ ĝin* en tiu frazo.

### Tempo

*Antaŭ* ofte montras tempon pli fruan ol alia tempo. Tiam *antaŭ* staras antaŭ esprimo de tempo, okazaĵo aŭ ago. Tempa *antaŭ* estas la malo de tempa *post* (§12.3.4.9):

- *Ili ordonis al mi veni **antaŭ la vesperiĝo**.* [M.8] *= ... pli frue ol la vesperiĝo.*
- ***Antaŭ tri tagoj** mi vizitis vian kuzon.* [FE.20] *= Je tri tagoj pli frue ol nun...*
- *La pastro, kiu mortis **antaŭ nelonge** (aŭ **antaŭ nelonga tempo**), loĝis longe en nia urbo.* [FE.25]
- *Ĉiu diskutota demando estos ja publikigita tri monatojn **antaŭ la kongreso**.* [OV.460]

Tempa *antaŭ* povas ankaŭ stari antaŭ vortoj, kiuj ne per si mem montras tempon, okazaĵon aŭ agon, sed kiuj tamen en la frazo reprezentas ion tian:

- ***Antaŭ la lango** laboru la cerbo.* [PE.802] *= Antaŭ <u>laboro</u> de la lango, laboru cerbo.*

Tempa *antaŭ* estas ofte uzata en esprimoj de horo (§23.8): *dek minutoj **antaŭ la tria*** k.s.

### *Antaŭ ol*

En iuj okazoj oni uzas *antaŭ* kune kun *ol* (§33.7):

- Antaŭ **subfrazo**. *Antaŭ* mem ne estas enkondukilo de subfrazo, sed nur rolvorteto, kaj do bezonas helpon de vera frazenkondukilo (§33.1).
- Antaŭ **O-vorteca frazparto, kiam verbo estas subkomprenata**. Tiam vere temas pri tuta subfrazo.
- Antaŭ **I-verbo**, ĉar I-verboj estas kvazaŭ subfrazoj (§27.5).

- ***Antaŭ lia alveno** ni manĝis. → **Antaŭ ol li alvenis**, ni manĝis.*
- *Mi finos **antaŭ ol vi**. = Mi finos **antaŭ ol vi finos**.*
- *En aŭtuno* [...] *aperadis la migrantaj birdoj kaj ripozadis sur ĝi, **antaŭ ol flugi trans la maron**.* [FA4.7]

### *Malantaŭ*

*Antaŭ* + la prefikso MAL (§38.3.7) montras pozicion ĉe la mala flanko kompare kun la antaŭa flanko:

- *Tuj **malantaŭ si** ŝi aŭdis viran voĉon.* [M.12] *= Tuj ĉe sia dorsa flanko ŝi ...*
- *La libristo staris sola **malantaŭ la magazena skribtablo**.* [M.120] La magazena tablo troviĝis inter li kaj la magazenaj klientoj, kiuj staris antaŭ la tablo.
- ***Malantaŭ la pordo** oni aŭdis la voĉon de la malgranda Jadvinjo.* [M.50] La pordo troviĝis inter la aŭskultanto kaj la voĉo.
- *Ni lasu la malfeliĉon **malantaŭ ni**.* [Rn.15] Temas pri pasinta okazaĵo, kiu kvazaŭ troviĝas dorsflanke de ni.
- *La luno iris returne **malantaŭ la nubojn**.* [FA2.119] *= ... al pozicio malantaŭ la nuboj.*

- *Ŝi prenis ankoraŭ* ***el malantaŭ la forno*** *faskon da lignetoj.* [M.8] = *... el pozicio malantaŭ la forno ...*

*Malantaŭ* neniam havas tempan signifon. Anstataŭe oni uzas *post* (§12.3.4.9). Ankaŭ kiam temas pri sinsekvo, oni uzas nur *post*. Oni ne diras ekz.: **Li erare metis la finaĵon N malantaŭ tiu vorto.** Tio signifus, ke la N estus kaŝita, ĉar vorto estus skribita sur ĝi. Oni diru: *... post tiu vorto.*

### Vortfarado

- *Antaŭ(aĵ)o*, *malantaŭ(aĵ)o* = "(mal)antaŭa flanko/parto (en loka senco)": *Kaj de la* ***antaŭo*** *de la pordego de la eniro ĝis la* ***antaŭo*** *de la interna portiko de la pordego estis kvindek ulnoj.* [Jĥ.40] *Iliaj haroj* [...] *kunvolvitaj sur la* ***malantaŭo*** *de la kapo en formo de bulo, pendis senorde sur la malgrasaj koloj.* [M.112] *Ĝi* [= la ligna bildo] *devis prezenti la Danon Holger kaj estis destinita por ornami la* ***antaŭaĵon*** *de ŝipo.* [FA2.109]
- *Antaŭe* = 1. "en pozicio antaŭ io (en sinsekvo), pli frue": *La juna knabino* [...] *iris* ***antaŭe****.* [M.7] ***Antaŭe*** *iris kantistoj, poste kordinstrumentistoj.* [Ps.68] *Kiam vi vidis nin en la salono, li jam* ***antaŭe*** *diris al mi la veron.* [FE.24] 2. "ĉe la antaŭa flanko" (malofta uzo): *Liaj vestoj estis broditaj* ***antaŭe*** *kaj malantaŭe.* [FA3.41]
- *Malantaŭe* = "en loko malantaŭ io, ĉe la malantaŭa flanko, en pozicio malantaŭ io": *Ili ĉiuj tri devis sidiĝi* ***malantaŭe*** [en la veturilo]*, kaj al tio ankoraŭ sur ligna kesto kun fera garnaĵo.* [FA4.169] *Ĝi estis la lasta en la vico, kaj baldaŭ ĝi restis je granda distanco* ***malantaŭe****.* [FA2.6] *Mi alpinglos* ***malantaŭe*** *la tuketon.* [Rz.20]
- *Antaŭen*, *malantaŭen* = "al la (mal)antaŭo": *Ilia vizaĝo estis direktita* ***antaŭen****.* [FA1.153] *Nia afero regule kaj trankvile iras* ***antaŭen****.* [OV.387] (= *... progresas.*) *Ŝi falis* ***malantaŭen****.* [FA3.45] *Ne rigardu* ***malantaŭen*** *kaj haltu nenie en la tuta ĉirkaŭaĵo.* [Gn.19]
- *Antaŭa* = "troviĝanta antaŭe, ĉe la antaŭo, pli frua": *La ĉevalo levis siajn* ***antaŭajn*** *krurojn. / Li reiris sur sian* ***antaŭan*** *lokon.* [M.122] *Mi faros en Ĝenevo nenion sen* ***antaŭa*** *konsiliĝo kun vi.* [L1.281]
- *Malantaŭa* = "troviĝanta malantaŭe, ĉe la malantaŭo": *La nigra hundeto* [...] *leviĝas supren sur la* ***malantaŭaj*** *piedoj.* [FA2.59] *La studento eniris tra la* ***malantaŭa*** *pordo.* [FA3.51]

### 12.3.4.2. *Apud*

*Apud* montras proksiman pozicion **flanke de io**. Normale temas pri la dekstra aŭ maldekstra flanko (ne la antaŭa aŭ malantaŭa), sed iafoje temas pli ĝenerale pri ia flanko. Tiam *apud* montras simple proksimecon (komparu kun *ĉe* §12.3.4.3, kiu ankaŭ montras proksiman pozicion):

- *Tra la fenestro, kiu sin trovas* ***apud la pordo****, la vaporo iras sur la korton.* [FE.25] = *... dekstre aŭ maldekstre proksime de la pordo ...*
- *Marta rigardis la* ***apud ŝi*** *irantan virinon per nebulitaj okuloj.* [M.100] = *... proksime dekstre aŭ maldekstre de ŝi irantan ...*
- *Li staris tutan horon* ***apud la fenestro****.* [FE.26]

- *La artefarita birdo havis sian lokon sur silka kuseno, senpere **apud la lito de la imperiestro**.* [FA2.29]
- *La gefianĉoj staris **apud la altaro**.* [FE.36] = *... proksime de la altaro.*
- *Kio estas tiu granda kastelo, tuj **apud la urbo**, kun la tiel altaj fenestroj?* [FA1.198]
- *Ok tagojn poste estis la varmega batalo **apud Prago**.* [Rt.46]
- ***Apud** li mi estas kiel nura komencanto.* Figura uzo de *apud* por esprimi komparon. Se mi starus apud li mi ŝajnus kiel nura komencanto. Iafoje oni uzas *ĉe* (§12.3.4.3) en simila maniero.

#### *Apud* + direktaj rolmontriloj

- *Ĝian kropon kun ĝiaj plumoj li forigu kaj ĵetu ĝin **apud la altaron**.* [Lv.1] = *... al loko apud la altaro.*
- *Kaj eliris **de apud li** ĉiuj, kiuj staris apud li.* [Jĝ.3]

#### Elparolo

Ial multaj fuŝas la elparolon de *apud*. La akcento devas esti sur la antaŭlasta vokalo: ***á**pud*. Ne: **ap**ú**d**.

#### Vortfarado

- *Apuda* = "troviĝanta proksime apud io": *Ŝi montris per la mano la pordon de la **apuda** ĉambro.* [M.95]
- *Apude* = "en (flanka) proksimo": ***Apude** kuŝis kelke da salatfolioj kaj kelke da kaŝtanoj.* [FA1.212]

### 12.3.4.3. *Ĉe*

*Ĉe* montras pozicion proksiman. La signifo de *ĉe* tre varias laŭ la kunteksto. Ofte *ĉe* montras simple lokon ĝenerale sen precizigo de la pozicio.

Estas ofta miskompreno, ke *ĉe* nepre montras tuŝecon. Fakte *ĉe* nur montras proksimecon. La diferenco disde *apud* (§12.3.4.2) estas, ke *apud* normale montras flankan pozicion (dekstre aŭ maldekstre). En frazoj kun *ĉe* ofte temas efektive pri intertuŝa proksimeco, sed tion ne montras *ĉe*, sed la kunteksto:

- *Kontraŭe **ĉe unu el la muroj** staris negranda ŝranketo.* [M.7] = *Kontraŭe tute proksime de unu el la muroj (verŝajne tuŝante ĝin) staris ...*
- ***Ĉe la angulo de la strato Swieto-Jerska** ŝi haltis.* [M.92] Ŝi haltis tute proksime de la angulo (verŝajne ne tuŝante ĝin).
- *Metu la du orajn plektitajn ĉenetojn en la du ringojn **ĉe la finoj de la surbrustaĵo**.* [Er.28] La lokoj de la du ringoj estas la finoj de la surbrustaĵo.
- *La stangoj estu **ĉe ambaŭ flankoj de la altaro**.* [Er.27]
- *Kiam li estis **ĉe mi**, li staris tutan horon apud la fenestro.* [FE.26] = *... en mia loko ... ... en mia hejmo ...* *Ĉe* ofte montras ies hejmon aŭ kutiman restadlokon.
- *La rajto loĝas **ĉe la venkinto**.* [Rt.13]

- *Mi servis* ***ĉe la komerca konsilano****.* [FA3.76]
- ***Ĉe botisto*** *la ŝuo estas ĉiam kun truo.* [PE.1156] *= En la hejmo de botisto ...*
- *En la varmaj landoj la suno radias alian varmegon ol* ***ĉe ni****.* [FA2.133] *= ... ol en nia (malvarma) lando.*
- *Li ofte venadis en la butikon* ***ĉe la strato Ptasia****.* [M.158] Zamenhof normale uzis *ĉe strato* k.s. por montri troviĝon de domo, loĝadreson k.t.p. Nuntempe oni preferas *en*.
- *La tramo numero 8 de nia urbo haltas* ***ĉe pli ol dudek haltejoj****.*
- *Kiel maldika ŝi estas* ***ĉe la koksoj****!* [FA1.44]
- *Okazon kaptu* ***ĉe l' kapo****, ĉar la vosto estas glita.* [PE.525] Tenatan korpoparton oni normale montras per *je* (§12.3.1).
- *La maljunaj geedzoj sidis* ***ĉe sia vespermanĝo****.* [FA2.120] Ili okupiĝis pri la vespermanĝo.
- *Baldaŭ seriozeco anstataŭis* ***ĉe ŝi*** *la momentan gajecon.* [M.47] *= ... en ŝia spirito ...*
- *La diritan dogmon* [...] *ni trovas en formo konforme esprimita nek* ***ĉe Kristo****, nek* ***ĉe Mozeo****, nek* ***ĉe iu alia****, – ni trovas ĝin nur* ***ĉe Hillel****.* [OV.331] *= ... nek en la diroj de Kristo, nek en la profetaĵoj kaj leĝoj de Mozeo, nek en tio, kion diris aŭ skribis iu alia, – ni trovas ĝin nur en la instruoj de Hillel.*
- *Kopirajto* ***ĉe la aŭtoro/ĉe la eldonejo****. = La kopirajto troviĝas ĉe ... La kopirajto apartenas al ...* Kutima (mallongigita) enskribo pri kopirajto en libroj k.s.
- *Se lin kompari kun la nuna reĝo, li estis Apolono* ***ĉe Satiro****!* [H.14] *= ... li estis kiel Apolono kompare kun Satiro.* Ĉi tie *ĉe* estas uzata figure por montri komparon. Oni imagas lin en la proksimo de Satiro. Oni ankaŭ povas uzi *apud* (§12.3.4.2) tiumaniere.

## Tempo

*Ĉe* povas ankaŭ montri proksimegecon tempan:

- ***Ĉe la komenco de la tagiĝo*** *la tuta arbaro aperis bele kovrita de prujno.* [FA3.32] *= Kiam komencis tagiĝi ...*
- ***Ĉe la efektiva najtingalo*** *oni neniam povas antaŭkalkuli, kio venos, sed* ***ĉe la artefarita birdo*** *ĉio estas difinita.* [FA2.29] *= Kiam la efektiva najtingalo kantas ... kiam la artefarita birdo kantas ...*
- *Li estas tre ekkolerema kaj ekscitiĝas ofte* ***ĉe la plej malgranda bagatelo****.* [FE.41] *= ... kiam okazas la plej malgranda bagatelo.*
- ***Ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros****, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono.* [FE.15] *= Samtempe kiel ĉiu vorto ...*
- ***Ĉe ĉiuj viaj krimoj*** *vi estas ankoraŭ sanktulo en komparo kun la patromortiginto.* [Rt.131] Ĉi tie estas ankaŭ ideo de kontrasto. Oni ankaŭ povus uzi *malgraŭ* (§12.3.6.6).

Por montri **horon** oni tamen ne uzas *ĉe*, sed ĉiam *je* (§12.3.1).

### *Ĉe* + direktaj rolmontriloj

Estus tute logike uzi *de ĉe*, *al ĉe*, kaj *ĉe* + N-finaĵon, por montri moviĝon de aŭ al pozicio proksima. Normale tamen simpla *de*, *al* aŭ N-finaĵo per si mem sufiĉas. Efektive *ĉe* nur montras, ke temas pri loko proksima, kaj do apenaŭ aldonus ion gravan al la signifo:

- *Ŝi leviĝis meze de la nokto kaj prenis mian filon **de ĉe mi**.* [Rĝ1.3] *= ... de pozicio ĉe mi.* Simpla *de mi* sufiĉus.
- *Ŝi prenis mian filon **al ĉe si**. = ... al pozicio ĉe si.* Sufiĉus *al si*.
- *Movu la ŝrankon **ĉe la muron**.* Sufiĉus *al la muro*.
- *Ŝi transloĝiĝis **ĉe sian fratinon**.* Sufiĉus *al sia fratino*.

Zamenhof neniam uzis *ĉe* + N-finaĵon, sed preferis *al* (sen *ĉe*) por esprimi moviĝon al la proksimo de io. Tial multaj rigardas uzon de *ĉe* + N-finaĵo kiel eraron. Estas tamen klare, ke *ĉe* + N-finaĵo neniel estas mallogika aŭ kontraŭgramatika, same kiel *de ĉe* (ja uzita de Zamenhof). Estas ankaŭ klare, ke simpla *al* plene sufiĉas. Ĉiu do rajtas mem decidi, ĉu uzi *ĉe* + N-finaĵon aŭ simplan *al* en tiaj ĉi okazoj.

### 12.3.4.4. *Ĉirkaŭ*

*Ĉirkaŭ* montras pozicion ĉiuflanke de io. (Tute ne devas esti rondforma pozicio malgraŭ la simileco kun la vorto *cirklo*.) Ofte *ĉirkaŭ* montras nur pli-malpli enferman pozicion:

- *La rabistoj sidis en rondo **ĉirkaŭ la fajro**.* [FA2.68] *= ... ĉiuflanke de la fajro.*
- *Miloj da kuloj svarmas **ĉirkaŭ la malgranda tendo**.* [FA1.225]
- *La alumeto eligis varman helan flamon,* [...] *kiam ŝi tenis **ĉirkaŭ ĝi** sian maneton.* [FA2.113]
- ***Ĉirkaŭ lia buŝo kaj liaj okuloj** estis plene de sulkoj.* [FA3.139]
- *Ŝiaj longaj belegaj haroj senorde ondiĝadis **ĉirkaŭ la bela kapo**.* [FA1.176]
- *Vinberbranĉoj volvis sin **ĉirkaŭ altaj kolonoj**.* [FA1.51]
- *Ŝi kuŝis kun rideto **ĉirkaŭ la buŝo**.* [FA2.91] La rideto estis en tiu parto de la vizaĝo.
- *La tero rondiras **ĉirkaŭ la suno**.* Oni povas ankaŭ diri: *La tero **ĉirkaŭiras** la sunon.*
- *Oni vidis* [...] *grandan akvon, kiun trafluis rivero, kiu serpentumis **ĉirkaŭ arbaro**.* [FA2.4]
- *Du pentraĵoj* [...] *kolektis **ĉirkaŭ si** amason da admirantoj.* [FA1.222]

Iafoje *ĉirkaŭ* signifas pli-malpli "en diversaj lokoj ene de", kio estas bazita sur la ideo, ke tiuj lokoj iele troviĝas ĉirkaŭ la mezo de la koncerna loko: ***Ĉirkaŭ la ĉambro** staris diversaj personoj. / Tiu firmao havas oficejojn **ĉirkaŭ la mondo**.* Simile oni uzas ankaŭ la rolvorteton *tra* (§12.3.4.14).

### *Ĉirkaŭ* + direktaj rolmontriloj

- *Foriru **de ĉirkaŭ la loĝejo de Koraĥ**.* [Nm.16] *= Foriru de pozicio ĉirkaŭ ...* Ankaŭ simpla *de* sufiĉas.

- *Siajn brakojn ŝi metis **ĉirkaŭ mian kolon**.* [FA1.235] = *... al pozicio ĉirkaŭ mia kolo.*
- *Ŝi sidigis lin en la glitveturilo apud si kaj metis **ĉirkaŭ lin** la pelton.* [FA2.54]
- *Ŝi frotis denove unu alumeton je la muro; ĝi ĵetis **ĉirkaŭ sin** vastan lumon.* [FA2.114]

En la ĉi-antaŭaj ekzemploj temas pri moviĝo al pozicio ĉirkaŭ io. Tio estas la normala uzo de loka rolvorteto + direkta N-finaĵo. Sed oni uzas *ĉirkaŭ* + N-finaĵon ankaŭ por montri moviĝon al loko, kiun oni atingas per ĉirkaŭmovo ĉirkaŭ io alia:

- *Ŝi dancis **ĉirkaŭ la angulon de la preĝejo**, ĉar ŝi ne povis halti.* [FA2.100] Ŝi dancis al la alia flanko de la preĝeja angulo per ĉirkaŭmovo. La celo de la moviĝo do ne estas pozicio ĉirkaŭ la angulo, sed pozicio ĉe la alia flanko de la angulo.
- ***Ĉirkaŭ la mondon** iras la vojaĝo.* La vojaĝo iras kompletan rondiron, kaj revenas al la komenca loko.

Komparu kun similaj uzoj de *preter* (§12.3.4.10), *tra* (§12.3.4.14), *trans* (§12.3.4.15) kaj *kontraŭ* (§12.3.4.8).

## Proksimumeco

Antaŭ tempaj vortoj *ĉirkaŭ* montras proksimuman tempon, ĉu antaŭ, ĉu post tempopunkto (eventuale kaj antaŭ, kaj post tempopunkto):

- ***Ĉirkaŭ la mateno** la ventego finiĝis.* [FA1.89] = *Proksimume je la mateno ...*
- *La granda persekutado* [...] *furiozis plej kruele **ĉirkaŭ la mezo de la dekkvara jarcento**.* [Rn.6]
- ***Ĉirkaŭ la unua horo** posttagmeze Marta estis denove sur la trotuaro.* [M.134]

*Ĉirkaŭ* montras proksimumecon ankaŭ kune kun nombrovortoj: *ĉirkaŭ tridek eŭroj*, *ĉirkaŭ cent jaroj* k.s. Tiam oni ofte uzas la skriban mallongigon *ĉ.*: *Tiu libro havas **ĉ. 1200** paĝojn.* = *... ĉirkaŭ 1200...* Legu pli detale pri tia uzo en la klarigoj pri nuanciloj de nombraj kaj kvantaj vortoj en §23.6.

## Vortfarado

- *Ĉirkaŭa* = "troviĝanta ĉirkaŭ io": *Li havis pacon kun ĉiuj **ĉirkaŭaj** landoj.* [Rĝ1.4]
- *Ĉirkaŭe* = "ĉiuflanke de io": ***Ĉirkaŭe** regis mallumo.* [FA3.36] *Supre sur ĝi li aranĝis **ĉirkaŭe** tintilojn.* [FA2.17] *Ĉiuflanke **ĉirkaŭe** ĝi estis kovrita per verda ŝtofo.* [FA2.44] *La kuracisto rigardis **ĉirkaŭen**.* [M.194] *Ardis karboj en tia kvanto, ke* [...] *ili povu nur eligi **ĉirkaŭen** agrablan varmon.* [M.147]
- *Ĉirkaŭi* = "esti en ĉirkaŭa pozicio, teni ĉirkaŭe, iri al pozicio ĉirkaŭa": *La ĝardenon **ĉirkaŭis** fera krada barilo.* [FA2.149] *Per la brako ŝi **ĉirkaŭis** la malgrandan talion de la infano.* [M.9] *Saul kun siaj homoj penis **ĉirkaŭi** Davidon kaj liajn homojn, por kapti ilin.* [Sm1.23]
- *Ĉirkaŭigi* = "kovri ĉiuflanke, almeti ion ĉiuflanke": *Vi **ĉirkaŭigus** vian kolon per travidigaj puntoj.* [M.155]

### 12.3.4.5. *Ekster*

*Ekster* montras pozicion malinterne de io, ĉe la malinterna (ekstera) flanko de io:

- *Mi staras **ekster la domo**, kaj li estas interne.* [FE.26] = *Mi staras malinterne de la domo, kaj li estas en la domo.*
- *Li loĝas **ekster la urbo**.* [FE.31]
- ***Ekster la pordo** atendas niaj amikoj.* = *Ĉe la malinterna flanko de la pordo ...* La interna flanko de pordo estas tiu flanko, kiu estas interne de la domo aŭ ĉambro. La malo de *ekster pordo* do ne estas *en pordo*, sed *interne de pordo* (interne de la domo aŭ ĉambro).

#### Figura uzo

- *Kian konstantan ĉiujaran sumon da mono ni devas havi, por ke la estonteco de nia afero estu tute **ekster danĝero**.* [OV.125] = *... tute ne en danĝero.*
- *Ne zorgu pri tio, kio estas **ekster via scio**.* [PE.998] = *... pri kio vi nenion scias.*
- *Clemency Newcome, tute **ekster si** de rido* [...] *apogis la kapon sur la maldekstra brako.* [BV.31] Ŝi ne povis regi sin pro rido. Ŝi estis kvazaŭ ekster sia propra korpo.
- *Li tre diligente laboras ankaŭ **ekster la oficialaj laborhoroj**.* Li laboras en alia tempo ol la laborhoroj. Tempa *ekster* estas tre malofta.

#### *Ekster* anstataŭ *krom*

Zamenhof iafoje uzis *ekster* anstataŭ *krom*, kaj en la signifo de escepta *krom* (§12.3.6.3), kaj en la signifo de aldona *krom* (§12.3.6.3):

- ***Ekster la nomo sen ia fondo** kaj **ekster laŭtaj reklamoj** ĝi nenion en si enhavas.* [OV.263] = *Krom la nomo ... krom laŭtaj reklamoj ...* Esceptaj *krom*.
- *Mi en vakstolaj paketoj alportadis al la homoj nenion **ekster trompaĵo kaj malveraĵo**.* [BV.67] = *... krom trompaĵo kaj malveraĵo.* Escepta *krom*.
- ***Ekster tio** el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj.* [FE.30] = *Krom tio ...* Aldona *krom*.
- ***Ekster la respondo letera**, ni poste donos al vi ankaŭ pli vastan respondon en nia gazeto.* [OV.104] = *Krom la respondo letera ...* Aldona *krom*.

*Ekster* havas normale nur pozitivan signifon, dum *krom* (§12.3.6.3) povas havi jen pozitivan, jen negativan signifon. *Ekster* anstataŭ *krom* estas nuntempe tre malofta.

#### *Ekster* + direktaj rolmontriloj

- *Ŝi* [...] *ekiris tute sola **ekster la pordegon** al la rivero.* [FA2.56] = *... ekiris tute sola al pozicio ekster la pordego ...*

- *Mi venigis ilin ĉiujn **ekster danĝeron**.* [FA3.152] = *... al situacio, kie ne ekzistis danĝero.*
- *Feliĉe mi sukcesis ekbruligi la fajron, mi vidis la ruĝan flamon, mi savis min **ekster la pordon**, sed tie mi falis kaj restis kuŝanta.* [FA3.152] = *... mi savis min al loko ekster la pordo ...*

*Ekster* + direkta N-finaĵo estas iom aparta, ĉar la vorto post *ekster* ne estas la celo de la movo. La signifo ŝajnas fakte pli demova ol almova. Tia uzado estas tamen tute logika. En ekz. *ekster la domon* la celo estas *ekster la domo*, ne *la domo*. Tute same en ekz. *en la domon* la celo ne estas *la domo*, sed *en la domo*. Anstataŭ *ekster* + N oni povas ofte uzi *el* (§12.3.5.2).

### Vortfarado

- *Ekstere*, *ekstera* = "ekster la afero, troviĝanta ekstere": *Starante **ekstere**, li povis vidi nur la **eksteran** flankon de nia domo.* [FE.31] (Ofte oni vidas la erarajn formojn **eksterna** kaj **eksterne** pro konfuzo kun *interna*, *interne*.)
- *Ekster(aĵ)o* = "ekstera parto, flanko aŭ spaco": *La **ekstero** de tiu ĉi homo estas pli bona, ol lia interno.* [FE.31] *Tiu domo* [...] *havis **eksteraĵon** malnovan kaj malgajan.* [M.6]

## 12.3.4.6. *En*

*En* montras internan pozicion. Kompleta enfermiteco ne estas necesa. Ofte estas nur parte interna pozicio. Oni uzas *en* ankaŭ pri lokoj, kiujn oni rigardas kiel spacojn, kvankam vere ili estas surfacoj:

- ***En la ĉambro** sidis nur kelke da homoj.* [FE.32] = *Interne de la ĉambro ...*
- *Skatolo, **en kiu** oni tenas plumojn, estas plumujo.* [FE.40]
- ***En la poŝo de mia pantalono** mi portas monujon.* [FE.40]
- *Marta havis nur unu penson **en la kapo**.* [M.67]
- ***En mia skribotablo** sin trovas kvar tirkestoj.* [FE.31]
- ***En la kandelingo** sidis brulanta kandelo.* [FE.40] La kandelo estas nur parte en la ingo.
- *Li kuŝis **en la lito**.* [FA3.144] *Kuŝi en lito* = kuŝi sub la litkovraĵo. *Kuŝi sur lito* = kuŝi sur la litkovraĵo.
- *Li sidis komforte **en sia fotelo**.* Oni sidas **en** fotelo, brakseĝo aŭ apogseĝo, ĉar ili havas brakojn, kiuj parte enfermas, sed oni sidas **sur** seĝo.
- *Sur la perono staris juna virino **en funebra vesto**.* [M.4] Oni diras, ke homo estas en vestaĵoj aŭ en vesto (eĉ en ŝuoj), kaj ke vestaĵoj estas sur homo. Homo tamen ne estas "en ĉapelo" aŭ "en ĉapo" (sed ĉapelo aŭ ĉapo ja estas sur kapo aŭ sur homo). Oni parolas ankaŭ pri homo **kun** ia vestaĵo.
- *La malfeliĉa infano forkuris kaj kaŝis sin **en la plej proksima arbaro**.* [FE.21] Arbaroj k.s. estas rigardataj kiel spacoj.
- *Mi konas neniun **en tiu ĉi urbo**.* [FE.28] Urboj kaj simile estas rigardataj kiel spacoj.

- *La rusoj loĝas* ***en Rusujo*** *kaj la germanoj* ***en Germanujo****.* FE.40 Landoj k.s. estas rigardataj kiel spacoj.
- *Mi vojaĝas* ***en Hispanujo****.* FE.26
- *La kuraĝa maristo dronis* ***en la maro****.* FE.37
- *La suno rebrilas* ***en la klara akvo de la rivero****.* FE.42
- *La ĉefa masto rompiĝis* ***en la mezo*** *kiel kano.* FA1.89 Oni ankaŭ povus uzi *ĉe*.
- ***En la kota vetero*** *mia vesto forte malpuriĝis.* FE.39 La vetero troviĝis ĉie ĉirkaŭe. Simile oni diras *en nebulo*, *en pluvo*, *en hajlado*, *en neĝado*, *en ŝtormo*, *en fulmotondro* k.t.p.

## Tempo

Ofte oni bildigas al si tempon kvazaŭ spacon, kaj uzas *en*. La "interno" de tempoperiodo estas inter la komenco kaj la fino de la periodo:

- ***En la tago*** *ni vidas la helan sunon, kaj* ***en la nokto*** *ni vidas la palan lunon kaj la belajn stelojn.* FE.10 *= Post la komenco de tago, kaj antaŭ ĝia fino ...*
- ***En somero*** *ni veturas per diversaj veturiloj, kaj* ***en vintro*** *ni veturas per glitveturilo.* FE.34
- ***En unu tago****, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino.* FE.15

*En* ofte montras tempon necesan por kompletigi ian agon:

- *Vi forgesos nin* ***en ses monatoj****!* BV.30 Plej malfrue post ses monatoj la forgeso estos kompleta.
- *Mi finos la tutan libron* ***en kvar tagoj****.* FE.14 La legado daŭros maksimume kvar tagojn.
- *Tiu ĉi fervojo estas konstruota* ***en la daŭro de du jaroj****.* FE.25

Sed ne uzu *en* kun la senco de tempa *post* (§12.3.4.9): *Mi revenos hejmen* ***post*** *du monatoj.* LR.149A La reveno ne okazos ene de la du monatoj, sed nur post tiuj monatoj.

Tempa *en* similas al *dum* (§12.3.6.2), sed *en* prezentas tempon kiel punkton (eĉ se temas pri longa tempo). *Dum* montras daŭron. Tempa *en* povas stari nur antaŭ tempa esprimo, sed *dum* povas stari ankaŭ antaŭ esprimo de ago: *Tio okazis dum mia loĝado en Romo.* Ne: **... en mia loĝado ...**. Oni ja diras *en ies ĉeesto* aŭ *foresto*, sed tiam *en* ne montras tempon, sed cirkonstancon (kvazaŭ lokon).

*Dum* ne povas montri tempodaŭron necesan por plenumi ion. La jena ekzemplo montras tiun diferencon: *Li parolis dum kvin minutoj, sed vane, ĉar tiajn demandojn oni ne povas respondi* ***en*** *kvin minutoj.*

Ankaŭ *tra* (§12.3.4.14) kaj *por* (§12.3.6.9) povas montri tempon.

## Figura uzo

*En* estas uzata en multegaj figuraj esprimoj, kiuj havas pli aŭ malpli da simileco kun la baza pozicia signifo de *en*. Oni uzas figuran *en* precipe pri formoj, statoj kaj situacioj:

- *La rabistoj sidis **en rondo** ĉirkaŭ la fajro.* [FA2.68] La grupo de sidantaj homoj havis rondan formon.
- *La domo forbrulis **en helaj flamoj**.* [FA4.31] Temas pri la stato de la domo, sed estas ankaŭ loka signifo. La domo troviĝis ene de la flamoj.
- *La birdoj alflugis **en grandaj amasoj**.* [FA1.177] Alflugis grandaj amasoj da birdoj.
- *Kelke da scienculoj sidis **en vigla interparolado**.* [FA1.119]
- *Danĝere estas lin lasi plu **en tia libereco**.* [H.113]
- *Laboru ĉiam **en plena unueco, en ordo kaj konkordo**.* [OV.410]
- *Mi vivas kun li **en granda amikeco**.* [FE.35]
- *Li estas hodiaŭ **en kolera humoro**.* [FE.31]
- *Ĉu mi eble povas **en ia maniero** helpi al vi?* [FA3.93]
- *Gideon, filo de Joaŝ, mortis **en tre maljuna aĝo**.* [Jĝ.8]
- *Ofte la ŝipo estis **en danĝero**.* [FA3.128]
- *Oni parolas **en Esperanto**.* [L1.150] La vortoj troviĝas "ene" de la lingvo.
- *Diru al mi la prezon **en eŭroj**.* La prezo estu esprimita per eŭroj. Oni ankaŭ povus uzi *per*.
- ***En tiaj okazoj** ni uzus la finiĝon "n".* [FE.28]
- *Mi ne konsentas kun li **en tio**.* [M.2] Aŭ ... *pri tio*.
- *Oni apenaŭ povus rekoni **en li** sinjoron Snitchey.* [BV.84] = *Oni apenaŭ povus rekoni, ke li estas sinjoro Snitchey.*
- *Laŭ la opinio de la gentaj ŝovinistoj patriotismo konsistas **en malamo kontraŭ ĉio, kio ne estas nia**.* [OV.382] Temas pri la esenca parto de io abstrakta. Por konkreta konsisto oni ordinare uzas *el* (§12.3.5.2): *Lia pakaĵo konsistis **el granda barelo**.* [FA4.214]

## *En* + direktaj rolmontriloj

- *Li eliris el la dormoĉambro kaj eniris **en la manĝoĉambron**.* [FE.31] = *... al la interno de la manĝoĉambro.*
- *La kuracisto konsilis al mi iri **en ŝvitbanejon**.* [FE.40]
- *Ĉe la enirejo **en la templon** li faris kvarangulajn fostojn el oleastra ligno.* [Rĝ1.8] = *Ĉe la enirejo, tra kiu oni iras por veni al la interno de la templo ...*
- *Venis al mi **en la kapon** feliĉa penso.* [M.77] = *Aperis en mia kapo feliĉa penso.*
- *Sablero enfalis **en mian okulon**.* [FE.41]
- *Multaj birdoj flugas en la aŭtuno **en pli varmajn landojn**.* [FE.32]

- *La kaleŝo enveturis* ***en la korton***. [FE.38]
- *Ni disiĝis kaj iris* ***en diversajn flankojn****: mi iris dekstren, kaj li iris maldekstren.* [FE.28]

*En* + N-finaĵo ofte montras "moviĝon" al nova formo aŭ stato, la rezulton de stata aŭ forma ŝanĝiĝo:

- *Se mi povus aliformiĝi* ***en ion****, mi volus esti tia ĉarma alaŭdo!* [FA1.136]
- *Dio ŝanĝis la malbenon* ***en benon***. [Neĥ.13]
- *La malgranda Tuk enfalis* ***en profundan dormon****, kaj tio estis bonefika por li.* [FA2.133]
- *La libroj estis tradukitaj* ***en ĉiujn lingvojn***. [FA2.24] Oni kvazaŭ movis la enhavon de la libroj de unu lingvo en ĉiujn aliajn.
- *Venis la servisto kaj dishakis la arbon* ***en malgrandajn pecojn***. [FA2.48]
- *El malantaŭ la longa tablo, kiu dividis la magazenon* ***en du partojn****, elkuris juna viro.* [M.78]

Iafoje oni uzas *al* (§12.3.5.1) por rezulto de ŝanĝiĝo. Zamenhof uzis ankaŭ *je* (§12.3.1).

### Vortfarado

- *Ena* = "interna": *La* ***ena*** *flanko de la domo ne estis same luksa kiel la ekstera.*
- *Ene* = "interne": ***Ene*** *la domo aspektis tute alie.* ***Ene*** *de la ĉambro troviĝis gaja kompanio.* (= *En la ĉambro ... Interne de la ĉambro ...*)
- *Enen* = "al la interno": *La infanoj kuris* ***enen*** *al la atendanta manĝo.*
- *Enigi* = "enmeti": *Ŝi* [...] ***enigis*** *la manojn en la harojn.* [M.196]
- *Eniĝi* = "iri/veni/moviĝi en la mezon de io": *La ĉevaloj de Faraono kun liaj ĉaroj kaj rajdantoj* ***eniĝis*** *en la maron.* [Er.15]

### 12.3.4.7. *Inter*

*Inter* montras pozicion, ĉe kies flankoj troviĝas du aŭ pli da aliaj aferoj. Se temas pri du aferoj, ili troviĝas ĉe du kontraŭaj flankoj. *Inter* estas iasence la malo de *ĉirkaŭ* (§12.3.4.4). *Inter* normale povas stari nur antaŭ multenombra esprimo, aŭ antaŭ du (aŭ pluraj) frazpartoj ligitaj per *kaj*:

- *Sur la kameno* ***inter du potoj*** *staras fera kaldrono.* [FE.25] La potoj staras dekstre kaj maldekstre de la kaldrono, aŭ antaŭe kaj malantaŭe, aŭ simile.
- *En la plej supra parto de alta domo,* ***inter kvar nudaj muroj****, ŝia infano tremis de malvarmo.* [M.92] La muroj troviĝas kvarflanke ĉirkaŭ la infano.
- *Tre proksime de la pordo staris granda fojnamaso, kaj* ***inter ĝi kaj la domo*** *troviĝis malgranda stalo.* [FA1.14] Unuflanke de la stalo estis la fojnamaso, aliflanke la domo.
- *Li rampis en la angulon* ***inter la muro kaj la marmora monumento*** *kaj endormiĝis.* [FA1.217] Unuflanke de la angulo troviĝis la muro, aliflanke la monumento.

- *Ekvadoro troviĝas* ***inter Kolombio, Peruo kaj Pacifiko****.* La du landoj kaj la maro triflanke komplete enfermas Ekvadoron.

### Ligo, simileco, reciproka rilato

Al la baza signifo de *inter* povas aldoniĝi nuanco de ligo, simileco aŭ reciproka rilato (amika, malamika aŭ neŭtrala):

- *Ni vojaĝis* ***inter Romo kaj Pizo****.* Logike la frazo nur diras, ke ni troviĝis ie inter la du urboj vojaĝante ien. Sed praktike la frazo signifas nepre, ke la vojaĝo deiris ĝuste de Romo kaj celis ĝuste Pizon. Oni ankaŭ povas diri *de Romo al Pizo*. *Inter* estas pli bona, se temas pri veturado en ambaŭ direktoj: *Li loĝas en Bratislavo kaj laboras en Vieno. Tial li ĉiutage veturas* ***inter tiuj du urboj****.*
- *La simileco* ***inter la malgaja sorto de la knabino kaj ŝia propra sorto*** *vekis en ŝi varmegan kunsenton.* [M.103]
- *Ili ĉiuj estis tre amikaj* ***inter si****.* [BV.77] Ĉi tie *inter si* egalas al *unu al la alia* (§23.1.3).
- *Ni deziras nur krei ligantan ponton* ***inter la gentoj****.* [OV.378] La ponto troviĝu inter la gentoj kiel ligo.
- *Neniam ĝis nun okazis* ***inter ili*** *ia malpaceto.* [FA4.173]

### Diseco, malsimileco

*Inter* povas ankaŭ esprimi disecon aŭ malsimilecon:

- ***Inter faro kaj rakonto*** *staras meze granda monto.* [PE.855] Granda monto disigas ilin.
- *Ankoraŭ antaŭ 50 jaroj* ***inter la Japanoj kaj Eŭropanoj*** *ekzistis ŝajne kolosa malsameco.* [OV.348]
- ***Inter sinjoro Eduardo kaj mi*** *ekzistis diferencoj grandegaj.* [M.153]

### Alternativoj

Iafoje *inter* montras alternativojn (du aŭ pli da elektebloj):

- *Ĉu estas tiel malfacile elekti* ***inter la ĉielo kaj la infero****?* [Rt.73]
- ***Inter amikoj viaj*** *elektu la plej saĝajn.* [H.131]
- *En la batalo* ***inter honoro kaj amo*** *ŝi decidis por la dua.* [Rt.88]

### Nepreciza *inter*

Iafoje *inter* montras malpli precize difinitan pozicion kune kun iaj aferoj aŭ en iaj cirkonstancoj:

- *Li* [...] *vidis larmojn, kiuj tremis* ***inter ŝiaj okulharoj****.* [FA1.194] La larmoj troviĝis en diversaj pozicioj pli-malpli inter la haroj.
- ***Inter fremdaj*** *ŝi estas edzino-anĝelo, kun la edzo ŝi estas demono kruela.* [PE.752] = *En la ĉeesto de fremdaj homoj ...*
- ***Inter lupoj*** *kriu lupe.* [PE.289] = *Kiam vi troviĝas kune kun lupoj, kriu lupe.*
- ***Inter la plej grandaj korpaj suferoj*** *li ne forgesis nian aferon.* [OV.71] = *Kiam li suferis de la plej grandaj korpaj suferoj ...*

### Aparteno al grupo

*Inter* povas montri apartenon al grupo. Tio similas al la ĉi-antaŭe montrita malpreciza *inter*. Iafoje temas pri efektiva pozicio pli-malpli inter la aliaj membroj de la grupo, alifoje la signifo estas pure apartena:

- ***Inter niaj amikoj** ne trovas sin ankoraŭ grandaj riĉuloj.* [OV.128] = *Grandaj riĉuloj ankoraŭ ne apartenas al nia amikaro.*
- *Ŝi tamen havis la senton, ke unu **inter ili** mankas.* [FA2.57] = *... ke unu membro de ilia grupo mankas.*
- ***Inter aliaj aferoj** tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en tre malproksima loko.* [FE.13] La akvoĉerpa tasko estis nur unu el tuta grupo de taskoj.
- *Eĉ **inter piuloj** ne mankas pekuloj.* [PE.131] = *Ankaŭ al la grupo piuloj apartenas pekuloj.*

La rolvorteto *el* havas iom similan uzon (§12.3.5.2).

### *Inter* ĉe unu-nombra vorto

Normale ne havas sencon uzi *inter* antaŭ sola unu-nombra vorto. Ekz. **inter domo** ne havas sencon. (Se temas pri la interno de domo, oni devas diri *en domo* aŭ *interne de domo*.)

Zamenhof tamen iafoje uzis *inter* antaŭ sola unu-nombra vorto por esprimi grupapartenon aŭ por esprimi disigon de substanco en partojn. Tia uzo tamen ne estas imitinda:

- *Vi elserĉu **inter la tuta popolo** homojn bravajn.* [Gn.18] Pli bone *el la tuta popolo*.
- *Kial malaperu la nomo de nia patro el **inter lia familio**, ĉar li ne havis filon?* [Nm.27] Prefere oni uzu la pli simplan esprimon *el lia familio*.
- *Kaj Dio diris: Estu firmaĵo **inter la akvo**, kaj ĝi apartigu akvon de akvo.* [Gn.1] Uzu *en la akvo*.
- *Se vi pistos malsaĝulon en pistujo **inter griaĵo**, lia malsaĝeco de li ne apartiĝos.* [SS.27] Pli bone *kune kun griaĵo* aŭ *en griaĵo*.

Iafoje povas havi sencon uzi ordinaran lokan *inter* + *ĉiu* + solan unu-nombran grupan esprimon: ***Inter ĉiu domparo/domduopo** staris malgranda arbo.* Temas pri ĉiuj interspacoj en vico de apudaj domoj. Oni ankaŭ povas diri: ***Inter ĉiu domo kaj la sekva** staris malgranda arbo.*

### *Inter* + direktaj rolmontriloj

- *Ŝi iris **inter la tulipojn**.* [FA1.149] = *... al loko inter la tulipoj.*
- *La suno lumis **inter la delikatajn bonodorajn foliojn**.* [FA2.123] = *... al loko inter la folioj.*
- *Kien ajn la luno povis lumi **tra inter la arboj**, li vidis plej ĉarmajn malgrandajn elfojn.* [FA1.63] La lumo iris de la luno, pasis inter la arboj, kaj pludaŭris.

- ***Inter la mano ĝis la buŝo*** *ofte disverŝiĝas la supo.* [PE.582] Normale oni dirus *Inter la mano kaj la buŝo ...*, sed ĉi tie Zamenhof elektis nekutime *ĝis* anstataŭ *kaj* por montri, ke io okazis dum movo de mano ĝis buŝo.
- ***El inter la branĉoj*** *ili sonigas sian voĉon.* [Ps.104] Ili (birdoj) sidas inter la branĉoj, kaj ilia voĉo iras el tiu loko.

### Tempo

*Inter* povas montri neprecizan tempopunkton post unu tempo, kaj antaŭ alia:

- *Estis* ***inter la sepa kaj oka horo*** *vespere.* [M.200] Estis ia tempopunkto/minuto post la sepa horo, sed antaŭ la oka.
- *Tio okazis* ***inter*** *lundo kaj vendredo.*

Se temas pri tuta periodo, oni uzas normale *de* (§12.3.2.1) + *ĝis* (§12.3.5.3): *de lundo ĝis vendredo*.

### Proksimumeco

Se *inter* staras antaŭ du nombroj, ĝi montras proksimumecon: *inter dek kaj dudek* = ia nombro pli alta ol (aŭ eble egala al) dek, sed malpli alta ol (aŭ eble egala al) dudek. Laŭ multaj ĉi tia *inter*-esprimo ekskluzivas la ekstremojn (*dek* kaj *dudek*): devas esti ia nombro ĝuste inter ili, ne ili mem. Sed kiam la efektiva signifo estas **proksimuma**, oni ne povas nomi precizajn limojn:

- *Por aĉeti ĝin vi devas pagi* ***inter 100 kaj 200*** *eŭrojn.* Vi devas pagi minimume 100 kaj maksimume 200 eŭrojn.

Legu pli detale pri tiaj nuanciloj de nombraj kaj kvantaj vortoj en §23.6.

### Vortfarado

- *Intera* = "troviĝanta inter aliaj similaj aŭ samspecaj aferoj": *El la tri domoj la* ***intera*** *domo* [= la domo, kiu troviĝas inter la du aliaj] *apartenas al mi.*
- *Intere* = "en intera pozicio": ***Intere*** *de la arboj staris urso.*
- *Intero* = "spaco aŭ tempo inter du aŭ pli da aferoj": *La* ***intero*** *de la du domoj estis tre malvasta.*
- *Interaĵo* = "intera parto, kiu troviĝas inter aliaj partoj de la sama afero": *La dekstra kaj maldekstra partoj de la aparato estas kompreneblaj, sed la* ***interaĵo*** *estas tre stranga.*

Ne konfuzu *intera*, *intere*, *intero*, *interaĵo* kun *interna*, *interne*, *interno*, *internaĵo*, kiuj egalas al *ena*, *ene*, *eno*, *enaĵo* respektive.

### 12.3.4.8. *Kontraŭ*

La baza signifo de *kontraŭ* estas “inversa direkto”.

#### Pozicio kun direkto

*Kontraŭ* povas montri pozicion de io, kies antaŭa flanko estas direktita al io alia, precipe al ties antaŭa flanko. La du aferoj havas do siajn antaŭajn flankojn direktitaj en inversaj direktoj kun spaco inter la du aferoj:

- *La reĝo sidis sur sia reĝa trono en la reĝa domo,* ***kontraŭ la enirejo*** *de la domo.* [Es.5] = ... *fronte al la enirejo* ... ... *vidalvide al la enirejo* ...
- *Ŝi sidis senmove* ***kontraŭ la estingiĝanta fajrejo*** *kaj meditis.* [M.13] Ŝia antaŭa flanko estis turnita al la fajrejo.
- *Aranĝis sin la Izraelidoj kaj la Filiŝtoj, fronton* ***kontraŭ fronto****.* [Sm1.17]
- *La pordegoj de la interna korto estis* ***kontraŭ la pordegoj norda kaj orienta****.* [Jĥ.40]
- *Li mezuris la longon de la konstruaĵo* ***kontraŭ la placo****, kiu estis malantaŭe.* [Jĥ.41] Li mezuris tiun flankon, kiu estis direktita al la placo.
- *Inter la pasejoj* [...] *estis pinta roko sur unu flanko kaj pinta roko sur la dua flanko* [...]. *Unu roko elstaris norde* ***kontraŭ Miĥmaŝ****, kaj la dua sude* ***kontraŭ Geba****.* [Sm1.14] La pintoj de la du rokoj estis direktitaj al la du respektivaj lokoj.
- *La Eternulo paroladis kun Moseo vizaĝon* ***kontraŭ vizaĝo****, kiel parolas homo kun sia amiko.* [Er.33]

#### Ŝanĝo en kontraŭan pozicion

Por montri ŝanĝon de direkto, turniĝon al nova direkto, oni uzas *kontraŭ* plus N-finaĵon:

- *Li levis la vizaĝon* ***kontraŭ la plafonon*** *kaj ridis laŭte kaj longe.* [M.163] Unue lia vizaĝo estis turnita en alia direkto. Poste li levis ĝin tiel, ke ĝi estis direktita kontraŭ la plafono.
- *Zminska levis* ***kontraŭ la junan virinon*** *siajn okulojn.* [M.32]

Sed se temas pri movo al ia loko, kie la movita afero havas direkton kontraŭ io, oni uzas *kontraŭ* sen N-finaĵo, ĉar tiam *kontraŭ* ne montras turniĝon al nova direkto:

- *Starigu la tablon ekster la kurteno, kaj la kandelabron* ***kontraŭ la tablo****, en la suda parto de la tabernaklo.* [Er.26] Oni metu la kandelabron en certan lokon. Tie ĝi staru kontraŭ la tablo.
- *Prenu ĉiujn estrojn de la popolo kaj pendigu ilin al la Eternulo* ***kontraŭ la suno****.* [Nm.25]
- *Li stariĝis antaŭ la altaro de la Eternulo* ***kontraŭ la tuta komunumo de Izrael****.* [Kr2.6]

### Movo kun direkto

Kune kun movaj verboj *kontraŭ* montras ion, direkte al kio io moviĝas:

- *Unu homa figuro venis **kontraŭ li**.* [BV.77]
- *Ili promenis man-en-mane **kontraŭ la leviĝanta suno**.*

En tiaj frazoj oni pli ofte uzas *direkte al*, *renkonte al* aŭ simile.

Por montri, ke kontraŭmovo atingas sian celon, kaj kuntuŝiĝas kun ĝi, oni povas uzi *kontraŭ* plus N-finaĵon:

- *Sovaĝa hajlo flugas **kontraŭ liajn tempiojn**.* [Rt.106] La hajlo trafas la tempiojn.
- *La salmo saltos **kontraŭ la falantan akvon** kaj frapos sin **kontraŭ la ŝtonajn murojn**.* [FA2.97]
- *Ĉiu el ili povis ĵeti ŝtonon **kontraŭ haron**, kaj ne maltrafi.* [Jĝ.20]

Se la kunteksto permesas, aŭ se la kuntuŝiĝo ne estas grava, oni povas uzi *kontraŭ* sen N-finaĵo:

- *La akvo en ĝi* [= la torento] *fluis tiel brue, ke estis tre malfacile naĝi **kontraŭ la fluado**.* [FA1.18] La malo estas *kun la fluado* aŭ *laŭ la fluado*.
- *Mi ekfrotis alumeton **kontraŭ la muro**.* [FA3.15]
- *Por la nokto oni starigis la kofrojn **kontraŭ la pordo**.* [FA1.143]

Komparu kun similaj uzoj de *ĉirkaŭ* (§12.3.4.4), *preter* (§12.3.4.10), *tra* (§12.3.4.14) kaj *trans* (§12.3.4.15).

### Malamika ago aŭ intenco

Ofte *kontraŭ* montras malamikecon, malfavorecon, negativecon k.s.:

- *La junulo aliĝis al nia militistaro kaj kuraĝe batalis kune kun ni **kontraŭ niaj malamikoj**.* [FE.39]
- *Vi blasfemas, Isaak, **kontraŭ la sola Dio**.* [Rn.45]
- *David eksciis, ke Saul intencas malbonon **kontraŭ li**.* [Sm1.23]
- *Mi ne devas agi **kontraŭ mia konscienco**.* [M.58] La malo estas *laŭ mia konscienco*.
- *Mi estas **kontraŭ via opinio (kontraŭ vi)**.* La malo estas *por via opinio*, *por vi*.

Se kun malamika signifo miksiĝas ideo de moviĝo, kiu atingas sian celon, oni uzas *kontraŭ* plus N-finaĵon:

- *Vi iras **kontraŭ min** kun glavo, lanco, kaj ŝildo; kaj mi iras **kontraŭ vin** en la nomo de la Eternulo.* [Sm1.17]
- *Ili venis en Laiŝon, **kontraŭ la popolon trankvilan kaj senzorgan**, kaj venkobatis ĝin per la glavo.* [Jĝ.18]
- *Li iris milite **kontraŭ ĉiujn siajn najbarojn** kaj venkis ilin ĉiujn.* [FA4.72]

### Forigo aŭ defendo de malbono

*Kontraŭ* povas montri malbonaĵon, kiam temas pri defendo, forigo aŭ ŝirmo de tiu malbonaĵo:

- *La Eternulo, kiu savis min* ***kontraŭ leono*** *kaj* ***kontraŭ urso****, savos min* ***kontraŭ ĉi tiu Filiŝto****.* [Sm1.17]
- *Por ŝirmi sin* ***kontraŭ la suno****, ŝi havis sur si grandan ĉapelon.* [FA2.56]
- *Li savis nin* ***kontraŭ la manoj*** *de malamikoj kaj* ***kontraŭ insidantoj*** *ĉe la vojo.* [Ez.8]

Iafoje oni ankaŭ povas uzi *de* aŭ *disde* (§12.3.2.1) en tiaj frazoj, sed ofte nur *kontraŭ* taŭgas:

- *Vi iru kaj forportu hejmen la grenon, kiun vi aĉetis* ***kontraŭ la malsato****.* [Gn.42] Nur *kontraŭ* montras, ke la greno helpu forigi la malsaton. ... *(dis)de la malsato* estus nekomprenebla.
- *Laboro* [...] *estas la plej efika, eble la sola efika higiena rimedo* ***kontraŭ malsanoj de la korpo kaj spirito****.* [M.193]

### Interŝanĝo

*Kontraŭ* povas montri ion, kion oni donas aŭ ricevas interŝanĝe:

- *Damasko donadis al vi komerce* ***kontraŭ la multo de viaj faritaĵoj*** *multe da diversaj valoraĵoj, vinon el Ĥelbon, kaj plej blankan lanon.* [Jĥ.27] Okazis interŝanĝo inter vi kaj Damasko. Vi donis viajn faritaĵojn, kaj Damasko donis diversajn valoraĵojn.
- *Ĝia mastrino proponadis siajn konsilojn, klarigojn kaj rilatojn al tiuj, kiuj ilin postuladis de ŝi, interŝanĝe* ***kontraŭ reciproka servo*** *en formo de mono.* [M.20]
- *Li renkontis du lernejkamaradojn el pli alta klaso, kiuj aĉetis de li la birdon* ***kontraŭ kelke da spesdekoj****.* [FA1.138]

Por tiu signifo oni uzas pli ofte *por* (§12.3.6.9). Ŝajnas bone uzi *por*, kiam temas klare pri vendo kaj aĉeto, kaj *kontraŭ*, kiam temas pri alispeca interŝanĝo, sed ofte ne estas eble distingi precize.

*Kontraŭ* povas ĉe la verbo *ŝanĝi* montri ion, kion oni prenas anstataŭ alia afero:

- *La ĉifonojn, kiujn li portas sur si, mi ne ŝanĝus* ***kontraŭ la purpuro*** *de reĝoj.* [Rt.35] *= ... mi ne prenus anstataŭe la purpuron de reĝoj.*
- *Oni ne povas ŝanĝi ĝin* ***kontraŭ vazoj*** *el pura oro.* [Ij.28]

Ĉe la verbo *anstataŭigi* oni ne uzas *kontraŭ* sed *per* (§12.3.6.7): *Ĉiu pli granda magazeno por siaj bezonoj uzas virojn, kaj kiu iam provis anstataŭigi ilin* ***per virinoj****, havis grandan malprofiton.* [M.89]

### Direkto de sento aŭ ago

*Kontraŭ* povas montri personon aŭ alian aferon, al kiu direktiĝas sento aŭ ago. *Kontraŭ* estas uzata precipe ĉe malamikaj sentoj kaj agoj, sed ankaŭ ĉe neŭtralaj aŭ eĉ amikaj. Oni ofte ankaŭ povas uzi *al* (§12.3.5.1):

- *Tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama tempo ŝi havis teruran malamon **kontraŭ la pli juna**.* [FE.13]
- *Asa ekkoleris **kontraŭ la antaŭvidisto** kaj metis lin en malliberejon.* [Kr2.16]
- ***Kontraŭ tiu homo**, kun kiu ŝi parolis, ŝi sentas ian ĉagrenon.* [M.179]
- *Ankaŭ Amalio estas ne indiferenta **kontraŭ li**!* [Rt.93] Se oni uzus ĉi tie *al*, temus pri lia sento pri Amalio. Nun temas pri ŝia sento pri li. Tion kaŭzas la dusenceco de *indiferenta*, kiu jen montras econ de seninteresaĵo, jen senton ĉe iu, kiu ne interesiĝas pri io.
- *Estu sinceraj **kontraŭ mi**.* [H.60]
- *Interkonsentigi ĉiujn opiniojn estas neeble kaj tial ni devas esti indulgaj unu **kontraŭ aliaj**.* [OV.531]

Por akcenti, ke la sento ekestas, ke temas pri ŝanĝo de stato, oni povas uzi *kontraŭ* plus N-finaĵon:

- *Povas ekflami la kolero de la Eternulo, via Dio, **kontraŭ vin**, kaj Li ekstermos vin de sur la tero.* [Re.6]

### Komparo

*Kontraŭ* iafoje signifas "kompare kun":

- *Mi ne forpelos ilin de antaŭ vi en unu jaro, por ke la tero ne fariĝu senhoma kaj por ke ne multiĝu **kontraŭ vi** la bestoj de la kampo.* [Er.23] *= ... por ke la bestoj ne fariĝu multaj kompare kun vi.*
- *La Eternulo, la Dio de viaj patroj, multigu vin miloble **kontraŭ via nuna nombro**.* [Re.1]
- ***Kontraŭ tuta kohorto** eĉ Herkulo estas malforta.* [PE.624] *= Kompare kun tuta kohorto ...* Oni povas ĉi tie kompreni ankaŭ malamikan agon en *kontraŭ*: *En batalo kontraŭ tuta kohorto ...*
- *Germanujo fariĝos respubliko, **kontraŭ kiu** Romo kaj Sparto estos monaĥinejoj.* [Rt.17] *= ... kompare kun kiu Romo kaj Sparto estos monaĥinejoj.*

### Vortfarado

- *Kontraŭa* = "tia, ke ĝi estas kontraŭ io": *Li ne scias, kiu loĝas en la **kontraŭa** domo.* [FA2.134] *Ili iris, sed ĝuste en la direkto ĝuste **kontraŭa** al tiu, en kiu ili devus iri.* [FA3.89] *Eble tio estos **kontraŭa** al la kristana favorkoreco?* [M.171]
- *Kontraŭe* = 1. "En kontraŭa pozicio aŭ direkto": *La reĝo kaj la reĝino sidis sur belega trono, ĝuste **kontraŭe** de la juĝistoj kaj de la tuta konsilistaro.* [FA1.12] *La vento blovas **kontraŭe**.* 2. "Kun kontraŭa volo, senco aŭ intenco": *Ili agis **kontraŭe** al la leĝoj.* 3. "Tute alie, tute male" (uzata

kvazaŭ propra frazo): *Mi havas nenian plendon kontraŭ li, **kontraŭe**, mi estas danka al li.* M.153

- *Kontraŭi* = "havi kontraŭan volon": *Ŝi **kontraŭis** al ilia propono.*
- *Kontraŭiĝi* = "ekhavi kontraŭan volon": *Ne **kontraŭiĝu** al nia feliĉo* [...]*!* Rz.77

### 12.3.4.9. *Post*

*Post* estas klarigita inter la lokaj rolvortetoj, ĉar ĝi havas unu signifon lokan, sed pli ofte ĝi estas tempa.

#### Loko

Loka *post* egalas al *malantaŭ* (§12.3.4.1):

- *Ŝi aŭdis **post si** brueton.* M.184 = *... malantaŭ si ... ... ĉe sia dorsflanko ...*
- *Tiam la virineto de maro fornaĝis kaj kaŝis sin **post kelkaj altaj ŝtonoj**.* FA1.90

Por loka signifo oni kutime uzas *malantaŭ*. Ĉe Zamenhof loka *post* estis sufiĉe ofta, sed tio aperas nuntempe tre malofte. Tamen, kiam *post* montras ne nur lokon, sed samtempe ankaŭ pozicion en sinsekvo, ĝi estas ankoraŭ tute normala.

#### Loka *post* kun direktaj rolmontriloj

- ***El post la dometo** iris vojo.* M.68 = *El loko ĉe la malantaŭa flanko de ...*

Normale oni apenaŭ uzas *post* kune kun direktaj rolmontriloj, sed je bezono *malantaŭ* kun ekz. N-finaĵo aŭ *de*.

#### Pozicio en sinsekvo

*Post* ofte montras pozicion en sinsekvo, nome pozicion, kiu sekvas alian. Ofte ĉeestas tiam ankaŭ pure loka signifo:

- *La maljuna Preben iris tuj **post la ĉerko**.* FA3.23 Dum la irado Preben sekvis la ĉerkon malantaŭ ĝi.
- *La monto malfermiĝis, kaj la reĝidino eniris. La vojkamarado sekvis tuj **post ŝi**.* FA1.74
- *Pli ol cent salonoj troviĝis vice unu **post la alia**.* FA2.73
- *Kiam ŝi skribas datojn, ŝi ĉiam skribas la tagon **post la monato**.*

Sinsekva *post* ne estas ĉiam distingebla disde tempa *post*.

Iafoje sinsekva *post* povas montri komparon, same kiel *antaŭ*: *Vi estas la plej bona **post mi**.* Vere plej bona estas mi, sed post mi sekvas vi.

### Tempo

Plej ofte *post* montras tempon pli malfruan ol alia tempo. Tiam *post* staras antaŭ esprimo de tempo, okazaĵo aŭ ago. Tempa *post* estas la malo de tempa *antaŭ* (§12.3.4.1):

- *Miaj fratoj havis hodiaŭ gastojn;* ***post la vespermanĝo*** *niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo.* FE.18 = *... kiam la vespermanĝo estis pasinta ...*
- *Tuj* ***post la hejto*** *la forno estis varmega,* ***post unu horo*** *ĝi estis jam nur varma,* ***post du horoj*** *ĝi estis nur iom varmeta, kaj* ***post tri horoj*** *ĝi estis jam tute malvarma.* FE.38 = *Tuj kiam la hejto estis okazinta ... kiam unu horo estis pasinta ...*
- *Li fianĉiĝis kun fraŭlino Berto;* ***post tri monatoj*** *estos la edziĝo.* FE.38 = *... kiam tri monatoj estos pasintaj ...*
- ***Post infekta malsano*** *oni ofte bruligas la vestojn de la malsanulo.* FE.39

Tempa *post* povas ankaŭ stari antaŭ vortoj, kiuj ne per si mem montras tempon, okazaĵon aŭ agon, sed kiuj tamen en la frazo reprezentas ion tian:

- *Kvaronon da horo* ***post tiuj vortoj*** [...] *droŝko* [...] *haltis antaŭ unu el la plej luksaj magazenoj de la strato Senatorska.* M.78 = *... post* <u>*eldiro*</u> *de tiuj vortoj ...*
- *Ekfluis larmoj, guto* ***post guto****, abundaj, pezaj.* M.141 = *... guto fluis post* <u>*fluo*</u> *de guto ...*
- *"Da"* ***post ia vorto*** *montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro.* FE.32 Ĉi tie temas pri sinsekvo tempa (dum parolo aŭ lego).
- *Ili ĉiam ripetadis* ***post la reĝo****: "Ho, ĝi ja estas tre bela!"* FA1.110 = *... post eldirado de la reĝo ... Post* havas ĉi tie ankaŭ iom de la signifo de *laŭ* (§12.3.6.5). *Ili ĉiam ripetadis laŭ la vortoj de la reĝo ...* Se oni uzas *malantaŭ* anstataŭ *post*, la senco fariĝas loka: *malantaŭ la reĝo* tiam montras, ke ili troviĝis ĉe la dorsa flanko de la reĝo, dum ili ripetadis.

Tempa *post* estas ofte uzata en esprimoj de horo (§23.8): *dek minutoj* ***post la tria*** k.s.

### *Post kiam*

Se *post* rilatas al tuta subfrazo, oni uzas *kiam* (§33.4.2) por enkonduki la subfrazon:

- ***Post lia alveno*** *ni manĝis.* → ***Post kiam li alvenis****, ni manĝis.*
- *Kristino ploris kaj Ib ploris, kaj* ***post kiam ili tiel estis plorintaj kelkan tempon****, ili kuŝiĝis sur la verdaĵo kaj endormiĝis.* FA3.88 = *... post sia plorado ...*

Teorie oni ankaŭ povus uzi *post ol* (§33.7) en tiaj frazoj, sed en la praktiko tio malofte okazas.

### Vortfarado

- *Posta* = "pli malfrua; malantaŭa": *La historio de la reĝo David, la antaŭa kaj la* ***posta****, estas priskribita en la kroniko de la antaŭvidisto Samuel.* [Kr2.29] *Ĝi* [= la glavo] *trapenetris la* ***postan*** *parton de la korpo.* [Jĝ.3]
- *Poste* = "post (iom da) tempo, post tio (tempe aŭ sinsekve)": *Li paliĝis de timo kaj* ***poste*** *li ruĝiĝis de honto.* [FE.39] *Subite granda hundo alsaltis el inter la arbetaĵoj, kaj tuj* ***poste*** *alia kaj ankoraŭ alia.* [FA1.171] *Antaŭe iris kantistoj,* ***poste*** *kordinstrumentistoj.* [Ps.68] *Unue ni manĝis,* ***poste*** *ni trinkis, pli* ***poste*** *ni babilis kaj fine ni endormiĝis.*
- *Postaĵo* = "pugo, sidvangoj, gluteoj (sidmuskoloj)": *Lian* ***postaĵon*** *kovris kalsoneto.* La vorto *postaĵo* baziĝas sur la malofta loka senco de *post*. Principe *postaĵo* egalas al *malantaŭaĵo* (§12.3.4.1), sed *postaĵo* havas tute specialan anatomian signifon, dum *malantaŭaĵo* estas uzebla por ĉia ajn malantaŭa parto aŭ flanko de io.

## 12.3.4.10. *Preter*

### Loko de moviĝo

*Preter* montras lokon, ĉe kies flanko okazas movo. La movo normale pluiras for de tiu loko:

- *Li pasis* ***preter mi*** *sen saluto.* [M.158] Li pasis flanke de mi.
- *Elizo devis iri tute proksime* ***preter ili****.* [FA1.174] Ŝi pasis flanke de ili.
- *La fiŝoj, kiuj naĝis en la akvo, fulmorapide preterflugadis* ***preter miaj oreloj****.* [FA1.25]
- *Li dronis en la rivero, kiu fluis proksime* ***preter la urbo****.* [FA2.55]

### Loko sen moviĝo

*Preter* povus ankaŭ montri lokon, kiu estas atingebla per movo flanke de io. Tiaj frazoj estas tamen tre maloftaj: *Mia hejmo troviĝas* ***preter tiuj arboj****.* Se vi volas atingi mian hejmon, vi devas iri preter tiuj arboj. Simila uzo estas ebla sed same malofta ĉe *tra* (§12.3.4.14). Ĉe *trans* (§12.3.4.15) tia uzo estas tamen tute normala.

### *Preter* + direkta N-finaĵo

Por klare montri, ke pretermovo pluiras for de la afero, oni povas uzi *preter* + N-finaĵon. Jam simpla *preter* povas havi tian signifon, kaj oni uzu N-finaĵon nur kiam tio helpas al klareco:

- *Ĝi iris al li* ***preter la buŝon****.* [PE.568] *= Li ne sukcesis profiti de ĝi.*
- *La vojo kondukis* ***preter preĝejon****.* [FA1.23] *= La vojo ne finiĝis ĉe la preĝejo.*

Komparu kun similaj uzoj de *ĉirkaŭ* (§12.3.4.4), *tra* (§12.3.4.14), *trans* (§12.3.4.15) kaj *kontraŭ* (§12.3.4.8).

### Figura uzo

- *Li agas* ***preter ĉia racio****.* Li tute ne uzas racion.
- *La pesto pasis* ***preter tiu urbo****.* La pesto ne trafis tiun urbon.

### Vortfarado

- *Pretere* = “preter io”: *La arbaroj estis densaj kaj mallumaj,* [...] *kaj **pretere** oni vidis grandajn kastelojn el vitro kaj marmoro.* [FA2.5] = *... preter la arbaroj ...*

## 12.3.4.11. *Sub*

*Sub* montras lokon pli malaltan ol io, kio estas pli-malpli rekte super ĝi. *Sub* plej ofte signifas “malsuper”. Tiam tio, kio troviĝas pli malalte, ordinare ne tuŝas tion, kio troviĝas pli alte. Iafoje *sub* signifas “malsur”. Tiam la suba afero ja tuŝas tion, kio troviĝas pli alte. Nur la kunteksto povas montri, ĉu temas pri tuŝo aŭ ne:

- *Li ofte ripozas ĉi tie **sub la foliriĉaj branĉoj** de la arbo.* [FA3.133]
- *Ekzistas nenio nova **sub la suno**.* [Pr.1]
- *Ĉe la Palazzo degli Uffici, **sub la arkadoj**,* [...] *la kupra porko haltis.* [FA1.212]
- *Ĉe tablo, kiu staris **sub la fenestroj*** [...] *sidis tri junaj virinoj.* [M.95] = *... ĉe la muro sub la fenestroj ...*
- *Sekaj folioj krakis **sub liaj piedoj**.* [BV.77]
- *Iliaj akcioj estu publikigataj **sub ia signo** anstataŭ **sub ilia nomo**.* [OV.66] Temas pri skribado sub titoloj, kiuj troviĝas pli alte sur la papero.
- *La muŝo estas **sub la plafono**.* Eble ĝi tuŝas la plafonon.
- *La lampo pendas **sub la plafono**.*
- *La slipon kun sekreta vorto li gluis **sub tirkesto de sia skribotablo**.*

### Kovrado

*Sub* povas ankaŭ montri lokon kovritan de io, sendepende de tio, kiu afero estas pli alta:

- *Grandan paperujon mi portas **sub la brako**.* [FE.40] La brako premas la paperujon al la flanko de la korpo.
- *Ehud faris al si glavon dutranĉan,* [...] *kaj zonis ĝin **sub sia vesto** al sia dekstra femuro.* [Jĝ.3] La vesto kovris la glavon flanke de la femuro.
- ***Sub dikaj tavoloj de farbo** kaŝiĝis la origina aspekto de la plafono.* Efektive la farbo troviĝas pli malalte ol la plafono.

La kovra signifo de *sub* troviĝas ankaŭ en kunmetaĵoj kiel *subvesto* kaj *subĉemizo* (vestoj portataj sub aliaj vestoj).

Komparu kun simila uzo de *super* (§12.3.4.12).

### Figura uzo

*Sub* povas montri nomon, aspekton, k.s., kun nuanco de kaŝado, malvereco aŭ nekonstanteco:

- *Ŝi eldonis la libron **sub kaŝnomo**.* = *... uzante kaŝnomon.*
- *Se **sub la nomo de vino** oni donos al vi senceremonie simplan akvon,* [...] *tiam vi restos tute sen vortoj.* [OV.264]

- *Li foriris **sub la preteksto**, ke li estas malsana.*
- *La Lingvo Internacia estas pli konata **sub la nomo Esperanto**.* La vera origina nomo de Esperanto estas “Lingvo Internacia”.

*Sub* povas montri dependecon, obeadon, malpli altan rangon aŭ valoron, k.s.:

- *La traveturanta oficisto volos antaŭ ĉio ĉirkaŭrigardi la kadukulejojn, kiuj estas **sub via estreco**.* [Rz.6] = *... la kadukulejojn, kiujn vi estras.*
- *Mi alveturis ĉi tien de malproksimeco de tridek mejloj, kun la firma decido servi **sub vi**.* [Rt.84]
- ***Sub la influo** de antaŭkongresa agitado la kongreso elektis tro grandan nombron da komitatanoj.* [L1.227]
- ***Sub la kondiĉo de malgranda alpago** oni konsentis sendadi al ŝi tagmanĝojn.* [M.37]
- *Baruĥ enskribis en libron-rulaĵon **sub diktado de Jeremia** ĉiujn vortojn de la Eternulo.* [Jr.36] = *... laŭ diktado ...*
- *Jen la sklavinoj ekdancis belegajn flugetajn dancojn **sub la plej bela muziko**.* [FA1.98] = *... laŭ la plej bela muziko.*
- *La temperaturo en tiu regiono atingas 30 gradojn **sub nulo**.* Legu ankaŭ pri (teorie) ebla uzo de *sub* kiel nuancilo de nombraj kaj kvantaj vortoj kun la signifo “malpli ol” en §23.6.

### *Sub* + direktaj rolmontriloj

- ***El sub** la kanapo la muso kuris **sub la liton**, kaj nun ĝi kuras sub la lito.* [FE.26] = *El loko sub la kanapo la muso kuris al loko sub la lito, kaj nun ĝi kuras en loko sub la lito.*
- *Li falis **sub la radojn** de veturanta vagonaro kaj mortiĝis.* [FE.39]
- *Abŝalom rajdis sur mulo. Kaj la mulo trafis **sub interplektitajn branĉojn** de granda kverko, kaj lia kapo alkroĉiĝis al la kverko.* [Sm2.18]

Ankaŭ kiam *sub* estas uzata figure, oni povas aldoni direktajn rolmontrilojn:

- *Li metis ilin **sub gardon** en la domon de la estro de la korpogardistoj.* [Gn.40]
- *Mi elirigos vin **el sub la jugo** de Egiptujo.* [Er.6]

### Vortfarado

- *Sube*, *suba* = “sub io, troviĝanta sub io”: *Li loĝas ie **sube** de tiu ĉi etaĝo. Li loĝas en **suba** etaĝo.*
- *Ĉi-sube*, *ĉi-suba* = “sub tio ĉi, troviĝanta sub tio ĉi”: *Skribu vian nomon **ĉi-sube**. **Ĉi-sube** loĝas franca familio. La **ĉi-suba** teksto estas tre grava.*
- *Subigi* = “meti sub regadon”: *Nun la loĝantojn de Judujo kaj Jerusalem vi intencas **subigi** al vi kiel sklavojn kaj sklavinojn.* [Kr2.28]
- *Subiĝi* = “moviĝi sub ion”: *La virineto de maro ektimis kaj **subiĝis** sub la akvon.* [FA1.87]

### 12.3.4.12. *Super*

#### Loko

*Super* montras lokon pli altan ol io, kio troviĝas pli-malpli rekte sub ĝi. Inter la du lokoj estas (normale) spaco, tiel ke ne estas intertuŝo:

- *Vidu, **super ni** briletas plej bela stelo!* [FA2.107]
- ***Super la komodo** pendis granda pentraĵo en riĉe orita kadro.* [FA2.4]
- *Subite **super la kapo** de la profunde enpensiĝinta virino eksonis du voĉoj.* [M.144] Ŝi sidis, kaj la parolantoj staris.
- *David alkuris, stariĝis **super la Filiŝto**, prenis lian glavon, elprenis ĝin el la ingo, kaj mortigis lin.* [Sm1.17]
- *Ĉi tiuj ilin mortigis, kaj dehakis iliajn manojn kaj piedojn, kaj pendigis ilin **super la lageto** en Ĥebron.* [Sm2.4]
- *"Hodiaŭ vespere ni ne havas tempon por tio," diris la dio de dormo kaj etendis **super li** sian belan ombrelon.* [FA2.10]
- *La mateno de la nova jaro leviĝis **super la malgranda kadavro**.* [FA2.114] Leviĝis la suno.
- *Ĉe la tablo **super telero plena de supo** sidis Janjo.* [M.92] Por manĝi el la telero ŝi sin klinis super la telero. Komparu kun figura uzo por montri labortaskojn ĉi-poste.
- *Antaŭ li multaj blinduloj falis **super tiu ĉi ŝtono**.* [LR.72A] La falado okazis ĝuste super la ŝtono al loko trans ĝi. Nur la kunteksto komprenigas, ke la ŝtono iel ankaŭ kaŭzis la faladon. Oni uzas ankaŭ *sur* en tiaj ĉi frazoj.

Normale ĉe *super* ne estas intertuŝo inter la du aferoj. Iafoje tamen estas intertuŝo, sed tiel malgrava, ke oni ĝin ne konsideras. Se estus grava intertuŝo, oni uzus anstataŭe *sur*:

- ***Super la tero** sin trovas aero.* [FE.26]
- *Forta ventego blovis **super la maro kaj la tero**.* [FA4.11]
- *Ŝi malfermis la vitran pordon, kiu troviĝis **super kelke da ŝtupetoj**.* [M.184]
- *Jakob starigis monumenton **super ŝia tombo**.* [Gn.35]
- *Ili iris kaj iris **super velkintaj folioj kaj sekaj defalintaj brančoj**; kraketis sub iliaj malgrandaj piedoj.* [FA3.88] Ĉi tie *sur* estas verŝajne preferinda.

#### Kovrado

*Super* iafoje montras kovradon sen distingo de alteco aŭ intertuŝo:

- *La neĝaj flokoj faladis sur ŝiajn longajn blondajn harojn, kiuj en belaj bukloj pendis **super ŝia nuko**.* [FA2.113] La haroj kovris la nukon.
- *La litkovrilon li tiris pli alten **super si**, la ĉapeton pli profunden **super siaj oreloj**.* [FA3.140] La litkovrilo estis pli alta ol li, sed tuŝis lin. La ĉapeto kovris la orelojn flanke de la kapo kun tuŝo. Ĉi tie estas tamen grava nur la signifo de kovrado.
- *La peza tavolo da sablo kuŝis kaj ankoraŭ nun kuŝas **super ĝi**.* [FA4.195] Ĝi (la preĝejo) estas kovrita de sablotavolo.

Oni povas vidi la kovran signifon de *super* ankaŭ en vortoj kiel *supervesto* kaj *supertuto* (vestoj, kiuj kovras aliajn).

Komparu kun simila uzo de *sub* (§12.3.4.11).

### *Super* + direktaj rolmontriloj

- *Plej belaj fiŝoj kun arĝentaj kaj oraj skvamoj naĝis post la boato; de tempo al tempo ili elsaltis* ***super la akvon****.* [FA2.5] *= ... elsaltis al loko super la akvo.*
- *La suno leviĝis* ***super la teron****.* [Gn.19] *= ... al pozicio super la tero.*
- *La aerŝipo flugas* ***super la landon****, el kiu eliris Kolumbo.* [FA3.55] *= ... al super la lando ...*
- *Marta returnis sin kaj ekvidis tiun saman virinon, kiu* [...] *levis la kapon* ***de super la maŝino*** *kaj faris al ŝi ĝentilan saluton.* [M.100] *= ... de pozicio super la maŝino ...*

### Figura uzo

Oni povas per *super* montri ion, kio spertas pasadon de tempo, kvazaŭ sur la ĉielo super ĝi:

- *Mallumaj tagoj, malvarmaj noktoj pasis* ***super la malnova sonorilo****.* [FA4.211]
- *Sesdek jaroj pasis* ***super mia kapo****.* [BV.30]

*Super* ofte montras regadpovon, pli altan rangon, pli altan valoron, pli da forto aŭ simile:

- *Li fariĝos reĝo* ***super la tuta lando****.* [FA1.69] Kiel reĝo li havos pli altan rangon ol ĉiu ajn alia en la tuta lando.
- *Li asertis, ke li havas potencon* ***super ŝi****, kaj tial* [...] *li kapbalancis sian jeson.* [FA2.105]
- *Dank' al la lingvo ni tiel altiĝis* ***super la bestoj****.* [FK.229]
- *La muzikaĵisto laŭdadis la birdon* ***super ĉiuj mezuroj****.* [FA2.28]
- *La temperaturo en tiu regiono malofte estas* ***super nulo****.* Legu ankaŭ pri (teorie) ebla uzo de *super* kiel nuancilo de nombraj kaj kvantaj vortoj kun la signifo "pli ol" en §23.6.

*Super* povas montri labortaskon, super kiu laboranto kvazaŭ sin klinas. Iafoje estas vera klinado super afero, sed ofte estas nur figura esprimo:

- *Kiel ŝi taŭgus por balai la ĉambrojn aŭ en la daŭro de tutaj horoj stari* ***super gladilo****...* [M.181] Por uzi gladilon oni devas iomete sin klini super ĝi, sed montrado de labortasko estas ĉi tie la ĉefa signifo.
- *Ili, kiel antaŭe, daŭrigadis labori* ***super la malplenaj teksiloj****.* [FA1.109] Verŝajne ili ne sin klinis super la teksiloj.
- *Li ŝvitas ankoraŭ* ***super la alfabeto****.* [PE.9] Li devas lerni la alfabeton.
- *Laboru ankoraŭ iom* ***super la muziko****.* [M.19] *= ... pri la muziko por plibonigi viajn sciojn pri ĝi.*

### *Super* kaj *supre*

Ne konfuzu *super* kun *supre*. *Super* estas rolvorteto, dum *supre* estas E-vorto. La signifoj estas similetaj, sed tamen malsamaj. *Super* ≈ "pli alte ol". *Supre* ≈ "ĉe la plej alta parto de io" (*supro* = "la plej alta parto"):

- *Li staras **supre** sur la monto.* [FE.33] = *... sur la supro (la pinto) de la monto.*
- *La birdo ŝvebas **super** la monto.* = *... en pozicio pli alta ol la monto.*

Tamen oni uzas *supre* ankaŭ kiam oni logike povus uzi *supere* (super tiu loko): *Ĉie estis silente kaj dezerte, nur la falstelo rakontis al ni, ke **supre** en la ĉielo moviĝas vivo.* [FA1.231] = *... ke super ni en la ĉielo ...*

La esprimo *ĉi-supre* ofte signifas "pli supre ol ĉi tie" aŭ "en antaŭa loko (en teksto)": *La prezoj indikitaj **ĉi-supre*** [en la teksto] *estas tiuj aplikitaj dum la UK.*

### Vortfarado

- *Supera* = "havanta (pli) altan rangon, forton, valoron" k.t.p.: *Kolonelo estas **supera** al kapitano.* (= *... havas pli altan rangon ol ...*) *Mi esperas, ke ili povos studi en **supera** lernejo.* La formo *supere* normale ne estas uzata (vidu ĉi-antaŭe pri *supre*).
- *Superi* = "esti supera al io en rango, forto, valoro" k.t.p.: *Malbona virino diablon **superas**.* [PE.37] *Koncerne la iradon de la pensoj, li multe **superis** ĉiujn aliajn.* [FA3.119] *En la regiono de la instruado la proponado de laboro multe **superas** ĝian postuladon.* [M.37]
- *Malsupera* kaj *malsuperi* estas la maloj de respektive *supera* kaj *superi*, sed la formo **malsuper** ne estas uzata. Anstataŭe oni uzas *sub* (§12.3.4.11).

Rimarku, ke *(mal)supera* kaj *(mal)superi* neniam uziĝas kun simpla loka senco, sed nur pri supereco de rango, forto, valoro, kvanto k.s.

### 12.3.4.13. *Sur*

*Sur* montras lokon ĉe la surfaco de io. Normale temas pri apogo, fiksiteco, alpremo, tuŝa kovrado, aŭ alia grava intertuŝo.

Plej ofte *sur* montras intertuŝan pozicion pli altan ol la tuŝata surfaco:

- ***Sur la tero** kuŝas ŝtono.* [FE.6]
- *La libro estas **sur la tablo**, kaj la krajono kuŝas **sur la fenestro**.* [FE.6] = *... sur la fenestra breto.*
- *Kiu kuraĝas rajdi **sur leono**?* [FE.7]
- *Mi sidas **sur seĝo** kaj tenas la piedojn **sur benketo**.* [FE.26] Pri *sur* kaj *en* ĉe mebloj vidu *en* (§12.3.4.6).
- ***Sur la korto** staras koko kun tri kokinoj.* [FE.33] Ankaŭ estas eble rigardi korton kiel spacon ĉirkaŭitan de muroj: *La kaleŝo enveturis **en la korton**.* [FE.38]
- ***Sur la bordo de la maro** staris amaso da homoj.* [FE.32]

- *Li povis bone observadi la malgrandan elegantan sinjorinon, kiu senlace staris* ***sur unu piedo****, ne perdante la ekvilibron.* [FA1.154] La cetero de la korpo troviĝas sur la piedo, pli alte ol la piedo, kaj fiksita sur ĝi. (La piedo siavice troviĝas sur ia surfaco.)
- ***Sur la arbo*** *sin trovis multe (aŭ multo) da birdoj.* [FE.32] La birdoj ne troviĝis pli alte ol la tuta arbo, sed ĉiu birdo sidis pli alte ol tiu parto (branĉo) de la arbo, sur kiu ĝi sidis.
- *Mi ne pendigis mian ĉapon* ***sur tiu ĉi arbeto****; sed la vento forblovis de mia kapo la ĉapon, kaj ĝi, flugante, pendiĝis* ***sur la branĉoj*** *de la arbeto.* [FE.39] Rimarku, ke direkta N-finaĵo ne aperas ĉi tie, ĉar *pendigi* kaj *pendiĝi* ne estas klare movaj agoj.
- ***Sur kruta ŝtuparo*** *li levis sin al la tegmento de la domo.* [FE.34]
- *Ŝi* [...] *facile kuris* ***sur la kotaj trotuaroj****.* [M.39] Same oni kuras, promenas k.s. *sur planko*, *sur ferdeko*, *sur kajo*, *sur perono*, *sur ĝeto* k.t.p.
- *Promenante* ***sur la strato****, mi falis.* [FE.22] Oni povas ankaŭ diri *en strato*, se oni vidas straton kiel spacon: *la rapida kuro en la glitiga strato* [M.12].
- ***Sur tiuj ĉi vastaj kaj herboriĉaj kampoj*** *paŝtas sin grandaj brutaroj.* [FE.34] Plej ofte oni vidas kampon kiel surfacon, sed oni ankaŭ povas rigardi kampon kiel spacon. Tiam oni diras *en kampo*.
- ***Sur la balkono*** *staris floroj, kiuj belege kreskis.* [FA2.134] *Balkono* estas rigardata kiel surfaco.
- *Marta ĉiam ankoraŭ sidis* ***sur la sama loko****.* [M.177]

*Sur* povas ankaŭ montri poziciojn ĉe surfaco sen distingo de alteco (komparu kun *super* §12.3.4.12 kaj *sub* §12.3.4.11):

- *Meze* ***sur la muro*** *pendis portreto.* [FA2.145] Fiksita sur la muro flanke de ĝi.
- ***Sur la ĉielo*** *staras la bela suno.* [FE.10] Oni rigardas la ĉielon kiel surfacon super la tero. Pri ĉielo oni povas ankaŭ uzi *en*.
- *Li kisis ŝin* ***sur la buŝo****.* [FA3.91]
- ***Sur lia vizaĝo*** *mi vidis ĝojan rideton.* [FE.38]
- *Li estas tre purema, kaj eĉ unu polveron vi ne trovos* ***sur lia vesto****.* [FE.41]
- *Ĉiuj havis* ***sur si*** *siajn festajn vestojn.* [FA2.27] La vestoj kovras la surfacon (la haŭton) de la homo. Pri *sur* kaj *en* ĉe vestaĵoj vidu *en* (§12.3.4.6).
- *Homoj metis* ***sur sin*** *tiajn okulvitrojn.* [FA2.50] Oni ankaŭ diras pli precize, ke oni portas okulvitrojn *sur la nazo*.
- *Bastoneto,* ***sur kiu*** *oni tenas plumon por skribado, estas plumingo.* [FE.40] Unu ekstremo de la plumo estas ja **en** la ingo. Uzante *sur* Zamenhof pensis ne pri la enmetita ekstremo, sed ĝenerale pri la tuta plumo, kiu estas fiksita sur la bastoneto. Se oni uzus *en*, povus eble ŝajni, ke la tuta plumo estas en la bastoneto.
- *La doma instruisto ludos solon* ***sur la fluto****.* [FA3.50] La ludanto tuŝos la surfacon de la fluto. Oni kompreneble ankaŭ povas uzi *per la fluto*, sed ofte *per* estas bezonata por alia ilo, per kiu oni ludas la muzikinstrumenton: *ludi violonon per arĉo*, *ludi muzikon* ***sur gitaro*** *per*

*plektro*, *ludi Ŝopenon* ***sur piano*** *per kvar manoj* (aŭ ... *per piano kvarmane/je kvar manoj*).

- *Da flankaj ĉambretoj ĉe la orienta pordego estis tri* ***sur unu flanko*** *kaj tri* ***sur la alia flanko***. [Jĥ.40] Oni povas preskaŭ ĉiam diri *ĉe flanko*, sed se efektive estas sur-eca pozicio, oni ankaŭ povas uzi *sur*.

### *Sur* + direktaj rolvortetoj

- *Mi metis la manon* ***sur la tablon***. [FE.26] = ... *al loko sur la tablosurfaco.*
- *Tra la fenestro, kiu sin trovas apud la pordo, la vaporo iras* ***sur la korton***. [FE.25]
- *La birdo ne forflugis: ĝi nur deflugis de la arbo, alflugis al la domo kaj surflugis* ***sur la tegmenton***. [FE.31]
- *La juna knabino prenis la infanon* ***sur sian brakon***. [M.7] = ... *prenis la infanon kaj metis ĝin sur sian brakon.*
- *Mi metus* ***sur ŝin*** *vestojn el atlaso, veluro, oro...* [M.147] = ... *al loko sur ŝia korpo ...*
- *Li metis al mi sian oran ringon* ***sur la fingron***. [FA3.76] La ringo poste kovris la fingron en ĉirkaŭa pozicio. Kutime oni ne diras, ke ringo troviĝas *ĉirkaŭ fingro*, sed tio estus tute logika.
- *La aktorino metis al si ŝminkon* ***sur la vizaĝon***.
- *Kvinope ili sin ĵetis* ***sur min****, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn.* [FE.14]
- *Li staras supre sur la monto kaj rigardas malsupren* ***sur la kampon***. [FE.33] *Sur* + direkta N-finaĵo ofte montras direkton de rigardado k.s.
- *Jen vi forpelas min hodiaŭ* ***de sur la tero***. [Gn.4] = ... *for de loko sur la tero.* Normale sufiĉas simpla *de*.

### Figura uzo

*Sur* estas uzata ankaŭ en diversaj figuraj esprimoj:

- *La konfeso de ŝia amo troviĝis jam* ***sur ŝia lango***. [FA2.141] = *Ŝi estis tute preta eldiri sian konfeson de amo.*
- *Li portis* ***sur si*** *la pekon de multaj kaj petis por la krimuloj.* [Jes.53] La peko estis kiel ŝarĝo sur li.
- *Ĝi ne faros* ***sur mi*** *tian impreson.* [FA1.17] La impreso estus kvazaŭ sur mia surfaco, se ĝi okazus.
- *Vere teruran efikon faris* ***sur mi*** *la glaso da punĉo!* [FA1.123]

Ankaŭ figura *sur* povas aperi kun direkta N-finaĵo:

- *Se mi iam devus elekti fianĉinon, tiam la elekto pli volonte falus* ***sur vin***. [FA1.100]
- *Tio ĉi estis feino, kiu prenis* ***sur sin*** *la formon de malriĉa vilaĝa virino.* [FE.15] La formo kvazaŭ kovris ŝian surfacon.
- *Ĉiuj okuloj fiksiĝis* ***sur min***. [Rt.88] Ĉiuj ekrigardis fikse min.

### 12.3.4.14. *Tra*

#### Loko de moviĝo

*Tra* montras lokon, ene de kiu okazas moviĝo. La moviĝo komenciĝas ekster la afero, iras en ĝin, kaj pluiras ĝis la alia ekstremo de la afero. La moviĝo povas ankaŭ komenciĝi ĉe unu ekstremo, kaj daŭri al la alia ekstremo. La moviĝo povas pluiri for de la loko, aŭ resti ene de ĝi sen iri pluen, laŭ la kunteksto:

- ***Tra la fenestro**, kiu sin trovas apud la pordo, la vaporo iras sur la korton.* [FE.25] La vaporo estas unue en la domo, iras al la fenestro, en ĝin, el ĝi, kaj atingas fine la korton.
- *La koboldo rigardis **tra la serura truo** kaj vidis, ke la studento legas.* [FA3.52] La rigardo "iris" en la seruran truon, el ĝi, kaj en la alian ĉambron.
- *Li estas tiel dika, ke li ne povas trairi **tra nia mallarĝa pordo**.* [FE.33]
- *Mallarĝa vojeto kondukas **tra tiu ĉi kampo** al nia domo.* [FE.38] Oni rigardas la kampon kiel lokon kun interno. La vojeto "iras" de ie, en la kampon, al la alia flanko de la kampo, kaj pluen al nia domo.
- *Du ekbriloj de fulmo trakuris **tra la malluma ĉielo**.* [FE.40] La ekbriloj aperis en unu flanko de la ĉielo, kaj kuris ĝis la alia flanko. Oni rigardas la ĉielon kiel lokon kun interno. (Oni povas rigardi ĝin ankaŭ kiel surfacon. Tiam oni uzus *trans*.)
- *Ni veturos de Hamburgo al Oslo **tra Kopenhago**.* Iafoje oni uzas *per* aŭ *pere de* en tiaj ĉi esprimoj.

#### Malpreciza *tra*

Ofte la moviĝo ne iras precize de unu flanko ĝis la alia, sed iel de loko al loko ene de la afero:

- *La soldatoj kondukis la arestitojn **tra la stratoj**.* [FE.22] Ili iris de iuj lokoj en la stratoj al aliaj lokoj en la stratoj.
- *Bala muziko bruis **tra la festaj salonoj**.* [FA3.15] La muziko sonis de loko al loko ene de la salonoj.

#### Loko sen moviĝo

Iafoje *tra* eĉ ne montras moviĝon, sed nur diversajn lokojn ene de io, iel pensigante pri ebla moviĝo de loko al loko: ***Tra la tuta lando** oni faris proklamon al ĉiu koro, kiu batis ame.* [FA3.24] Se oni iris tra la land, oni povis aŭdi tian proklamadon en multaj lokoj. ***Tra la tuta strato** konatoj kapsalutis nin el la fenestroj.* [FA4.129] Kiam ni veturis tra la stratoj, ĉie konatoj kapsalutis nin. Simile oni uzas ankaŭ la rolvorteton *ĉirkaŭ* (§12.3.4.4).

*Tra* povus ankaŭ montri lokon, kiu estas atingebla per movo ene de io. Tiaj frazoj estas tamen tre maloftaj. *La oficejo troviĝas **tra tiu pordo**.* Ĝi troviĝas en ĉambro atingebla per iro tra tiu pordo. Simila uzo estas ebla sed same malofta ĉe *preter* (§12.3.4.10). Ĉe *trans* (§12.3.4.15) tia uzo estas tamen tute normala.

### *Tra* + direkta N-finaĵo

Por klare montri, ke moviĝo plene trairas, kaj pluiras el la loko, oni povas uzi *tra* + N-finaĵon. Jam simpla *tra* povas havi tian signifon, kaj oni uzu N-finaĵon nur kiam tio helpas al klareco:

- *La stana soldato falis* ***tra fendon*** *kaj kuŝis nun en nefermita tombo.* [FA2.148] = *... plene tra la fendo kaj plu el ĝi.*
- *La sago iris* ***tra lian koron****.* [Rĝ2.9] ≈ *La sago plene penetris lian koron.*
- *Mi pafos per mia pafilo* ***tra la kradan aperturon de la pordego****, kaj tiam ĉiu gardu sian nazon!* [Rn.32] La pafoj eble trafos tiujn, kiuj staros ekstere.

Komparu kun similaj uzoj de *ĉirkaŭ* (§12.3.4.4), *preter* (§12.3.4.10), *trans* (§12.3.4.15) kaj *kontraŭ* (§12.3.4.8).

### Tempo

*Tra* povas signifi “la tutan tempon de la komenco ĝis la fino”:

- *La alta urbo, kiu* ***tra dek jaroj*** *la tutan grekan forton kontraŭstaris, prezentas nun ruinojn.* [IT.43]
- *La koko krias* ***tra la tuta nokto****.* [H.8]

Tempa *tra* similas al *dum* (§12.3.6.2). *Tra* tamen pli emfazas la sencon “de la komenco ĝis la fino”. Oni ankaŭ preferas *tra*, se io ripete aŭ multfoje okazis dum la tempo. Vidu ankaŭ *en* (§12.3.4.6) kaj *por* (§12.3.6.9).

### *Tra* kaj *trans*

Ne konfuzu *tra* kun *trans*. Vidu ĉe *trans* klarigon pri la diferenco: §12.3.4.15.

### Vortfarado

- *Trae* = “tra io”: *Iru, mi diras, aŭ mi trapikos vin* ***trae!*** [Rt.132] (= *... tra via korpo!*)
- *Traigi* = “movi aŭ piki k.s. tra io, tredi”: *Li* ***traigis*** *la fadenon tra la trueton de la kudrilo.*

## 12.3.4.15. *Trans*

*Trans* signifas “sur la alia flanko de”. Oni uzas *trans*, kiam estas necese iri super aŭ sur la afero por atingi tiun alian flankon:

- *Ĉi tiu estas jam* ***trans ĉiuj montoj****.* [Rn.18] = *Ĉi tiu estas jam sur la alia flanko de ĉiuj montoj.* Por iri tien, kie ĉi tiu estas, oni iru super (aŭ sur) la montoj.
- *Ankoraŭ antaŭ la malleviĝo de la suno ni devas esti* ***trans la limo!*** [Rt.103] = *... sur la alia flanko de la limo.*
- *La domo forbrulis en helaj flamoj, en kiuj li pereis kaj kiuj lumis ĝis la funebra betulo* ***trans la lago****.* [FA4.31] = *... ĝis la funebra betulo, kiu troviĝis sur la alia flanko de la lago.*

Komparu kun simila sed tre malofta uzo de *preter* (§12.3.4.10) kaj *tra* (§12.3.4.14).

Zamenhof ofte uzis *transe de* anstataŭ (senmova) loka *trans*: ***Transe de la mallarĝa kampa vojo*** *staras malnova kavalira kastelo.* FA2.58

### *Trans* + direktaj rolmontriloj

Oni povas uzi *de* (§12.3.2.1) aŭ *el* (§12.3.5.2) antaŭ *trans* por montri moviĝon de aŭ el loko aliflanke de io (per iro super aŭ sur ĝi):

- *Venis kontraŭ vin granda multo da homoj* ***de trans la maro****.* Kr2.20 = *... de loko, kiu troviĝas aliflanke de la maro.*
- *Belaj rakontoj* ***el trans la montoj****.* PE.186

Oni ofte uzas *trans* kune kun direkta N-finaĵo por esprimi moviĝon al loko aliflanke de io:

- *La hirundo flugis* ***trans la riveron****, ĉar trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj.* FE.26 = *... al trans la rivero ...* Ĉi tiu Fundamenta ekzemplo instruas, kiel oni distingas inter troviĝo aliflanke de io, kaj moviĝo al la alia flanko de io.
- *La knabo rapide elkuris tra la pordo,* ***trans la korton*** *kaj for el la domo.* FA1.217
- *La unueco estas pli granda en Dio. Li akompanas nin* ***trans la morton!*** FA3.105

Komparu kun similaj uzoj de *ĉirkaŭ* (§12.3.4.4), *preter* (§12.3.4.10), *tra* (§12.3.4.14) kaj *kontraŭ* (§12.3.4.8).

Zamenhof sufiĉe ofte uzis *trans* sen N-finaĵo, kiam temis pri moviĝo al la alia flanko de io:

- *Pensoj iras* ***trans limo*** *sen pago kaj timo.* PE.463 = *... al la alia flanko de limo ...*
- *Matene la vojo kondukas* ***trans ŝvelintaj riveroj****. Sidu forte sur via ĉevalo, por ke la torenta akvo vin ne forŝiru!* FA1.225

Ankoraŭ hodiaŭ oni povas renkonti tian uzon. Estas tamen preferinde en tiaj okazoj aldoni direktan N-finaĵon laŭ la ordinaraj reguloj: *iras trans limo**n***, *kondukas trans ŝvelintaj**n** riveroj**n***.

### *Trans* kaj *tra*

Ne konfuzu *trans* kun *tra* (§12.3.4.14). Transmovo iras super aŭ sur io. Tramovo iras ene de io:

- *Ŝi saltis* ***trans barilon****.* Ŝi saltis super la barilo al la alia flanko.
- *Ŝi kuris* ***tra barilon****.* Ŝi kuris tra truo en la barilo al la alia flanko.
- *Ili iris* ***trans la ponton****.* Ne: **... tra la ponton**, ĉar oni iras sur ponto, ne en ponto.
- ***Trans la buŝon*** *de la rigidmiena mastrino de la oficejo la unuan fojon en la daŭro de la tuta interparolado glitis nun rideto.* M.31 La rideto glitis ne en la buŝo, nek flanke de la buŝo, sed ĝuste sur la buŝo.

- *Kavaliraĵon oni metas al vi **trans la ŝultron**.* [Rz.83] La kavaliraĵon (ordenan rubandon) oni metas sur la ŝultron etendante ĝin de la brusto ĝis la dorso. *Tra* donus tute alian signifon.

### *Maltrans*

Logika, sed apenaŭ uzata, estas *maltrans* = "sur tiu ĉi flanko de": *Vi eraras. Tiu urbo ne troviĝas trans la rivero, sed **maltrans ĝi**.* = ... *Tiu urbo ne troviĝas aliflanke de la rivero, sed ĉi-flanke de ĝi.* Atentu pri la akcento: ***mál**trans*. Anstataŭ *maltrans* oni provis la novan rolvorteton *cis* (§19). Plej bona alternativo estas tamen *ĉi-flanke de*.

### Vortfarado

- *Transa*, *transe* = "aliflanka, aliflanke": *Ŝi transflugis sur la **transan** bordon.* [FA3.3] ***Transe** de la maro troviĝas lando tiel same bela, kiel ĉi tiu.* [FA1.165] *En ĝi estis skribita pri la vivo **transe** de la tombo.* [FA3.117] (= ... *aliflanke de la morto, post la morto.*)
- *Transigi* = "movi trans ion, pludoni, turni vidigante la alian flankon": *Ili perŝipe **transigis** varojn de unu bordo al la alia. / La fabelo en la daŭro de mil jaroj estis **transigata** de unu cikonio-patrino al alia cikonio-patrino.* [FA4.19] *Ŝi **transigis** la foliojn* [de la libro]. [FA1.162]
- *Transiĝi* = "iri trans ion, transiri en alian lokon/staton": *Per ŝipeto ili **transiĝis** al la alia bordo. / Permesu al mi proponi al vi **transiĝi** kun mi en alian loĝejon.* [Rz.30] *Liaj sentoj **transiĝis** en kompaton kaj malestimon.*

## 12.3.5. Direktaj rolvortetoj

En tiu ĉi paragrafo estas klarigoj pri la direktaj rolvortetoj *al* (§12.3.5.1), *el* (§12.3.5.2) kaj *ĝis* (§12.3.5.3), sed ankaŭ la N-finaĵo (§12.2.5) kaj la rolvorteto *de* (§12.3.2) estas direktaj rolmontriloj.

### 12.3.5.1. *Al*

*Al* montras celon. *Al* ofte similas al *por*. Vidu ĉe *por* klarigon pri la diferenco: §12.3.6.9.

### Direkto de movo

Normale *al* montras celon de moviĝo:

- *Mi venas de la avo, kaj mi iras nun **al la onklo**.* [FE.9] La celo de la irado estas la onklo.
- *En unu tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis **al ŝi** malriĉa virino.* [FE.15]
- *Vi devas nur iri **al la fonto** ĉerpi akvon.* [FE.17]
- *Sur kruta ŝtuparo li levis sin **al la tegmento** de la domo.* [FE.34]
- *Mallarĝa vojeto kondukas tra tiu ĉi kampo **al nia domo**.* [FE.38]
- *Josuo kaj la tuta Izrael ŝajnigis sin venkobatitaj de ili, kaj ekkuris en la direkto **al la dezerto**.* [Js.8]
- *Li kraĉos **al vi** en la vizaĝon.* [Rt.41]

## Direkto sen movo

*Al* povas montri direkton ankaŭ kiam ne estas movo:

- *La reĝido etendis siajn brakojn* ***al la ĉielo, al la arbaro*** *kaj* ***al la maro****.* [FA2.90] La brakoj estis direktitaj en la diversaj direktoj, sed ili ne moviĝis al tiuj lokoj.
- *Danke ŝi ridetadis* ***al li****.* [FA1.166] La ridetoj estis en lia direkto.
- *Li rigardis* ***al la klara, hela luno*** *supren.* [FA3.23]
- *Mi sopiras...* ***al la lando de mia infaneco****.* [FA3.31]
- *Kiele junulo povus kontraŭstari* ***al la ĉarmoj de malĉastulino****?* [Rt.32]
- *Dum momento ŝi staris senmove, apogante sin per la mano* ***al angulo de muro****.* [M.92]

## Ricevanto

*Al* tre ofte montras tiun, kiu ricevas ion, aŭ tiun, kiu ion aŭdas, vidas, ekscias, lernas k.t.p. (= ricevas sonon, bildon, sciaĵon, lernaĵon k.t.p.):

- *Donu* ***al la birdoj*** *akvon, ĉar ili volas trinki.* [FE.9] La birdoj ricevu akvon.
- *Mi redonas* ***al vi*** *la monon, kiun vi pruntis* ***al mi****.* [FE.14] Antaŭe mi ricevis la monon (prunte), nun vi ĝin rericevos.
- *Ŝi tuj lavis sian kruĉon kaj ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto kaj alportis* ***al la virino****.* [FE.15]
- *Petu ŝin, ke ŝi sendu* ***al mi*** *kandelon.* [FE.20]
- *Mia tuta ŝuldo estos pagita* ***al vi*** *baldaŭ.* [FE.25]
- *Diru* ***al mi*** *vian nomon.* [FE.18]
- *Rakontu* ***al mia juna amiko*** *belan historion.* [FE.10]
- *Kial vi ne respondas* ***al mi****?* [FE.20]
- *Ordonu* ***al li****, ke li ne babilu.* [FE.20]
- *Montru* ***al ili*** *vian novan veston.* [FE.18]
- *La kuracisto konsilis* ***al mi*** *iri en ŝvitbanejon.* [FE.40]
- *Mi instruas Esperanton* ***al mia infano****.* [LR.120A] (= *Mi instruas mian infanon pri Esperanto.* [LR.120A])
- *La lumo de la suno metis finon* ***al la bela sonĝo****.* [FA3.32] La sonĝo "ricevis finon" = finiĝis.
- *Oni donis* ***al li*** *panon, kaj li manĝis, kaj oni trinkigis* ***al li*** *akvon.* [Sm1.30]

## Profitanto, malprofitanto

*Al* povas montri tiun, kiu iel profitas aŭ malprofitas de ago. Alivorte *al* montras tiun, kiu "ricevas" la agon aŭ rezulton de la ago:

- *Mi ĉiam estas preta fervori en servado* ***al la patrujo****.* [Rz.62] La patrujo profitus de la servado.

- *“Pardonu **al mi**, patrino,” diris la malfeliĉa knabino, “ke mi restis tiel longe”.* [FE.17] La knabino profitus de la pardono. Ankaŭ estas eble uzi *Pardonu min*: §30.7.
- *Mi deziras **al vi** bonan tagon, sinjoro!* [FE.10]
- *Oni tiel malhelpis **al mi**, ke mi malbonigis mian tutan laboron.* [FE.33]
- *Antaŭ tri tagoj mi vizitis vian kuzon kaj mia vizito faris **al li** plezuron.* [FE.20]
- *Vi tiam povos tre humile teni **al li** la kaleŝon, kiam li veturos kun ŝi al la preĝejo por edziĝi.* [Rt.41]
- *Pro la bono de la afero ni devos cedi **al la plimulto**.* [OV.64] Ni cedos kaj la plimulto profitos de tio.
- *Mi cedas **al via peto**.* [FA1.17] = *Mi cedas al vi pro via peto.*

Tiaj ĉi *al*-komplementoj ofte montras samtempe apartenon aŭ posedon de korpoparto aŭ vestaĵo. Oni povas anstataŭe uzi posedan pronomon (§11.2), sed *al* estas pli klasika:

- *Ŝi kombas **al si** la harojn per arĝenta kombilo.* [FE.34] = *Ŝi kombas <u>siajn</u> harojn ...*
- *Mi **al vi** purigos la botojn.* [Rz.45] = *Mi purigos <u>viajn</u> botojn.*
- *Ili ŝmiris **al si** la angulojn de la buŝo per fiŝoleo, por ke ili fariĝu pli flekseblaj.* [FA3.96]
- *Por knabinoj tio ne estis irebla vojo, ili disŝirus **al si** la vestojn.* [FA2.88]

### Ricevanto de demova ago

*Al* povas montri la ricevanton (profitanton/malprofitanton) de ago, kiu estas **demova**. La ricevanto ja ricevas ian agon, sed la ago estas tia, ke ĝi forprenas ion de la ricevanto. Tia ĉi mikso de almovo kaj demovo povas esti konfuza. Ofte *de* estas pli klara:

- *Ŝi detiris **al li** la galoŝojn de la piedoj.* [FA1.145] Li ricevis servon, kiu konsistis el detirado de galoŝoj. Oni povus eble miskompreni, ke oni detiris la galoŝojn de alia persono, kaj poste li ricevis la galoŝojn. Oni uzas ankaŭ *de* en tiaj esprimoj: *Ili deprenis de li lian veston.* [Gn.37]
- *Vi rabas **al via homo** ĉion, kion li havas, ĝis ne restas al li eĉ ĉemizo sur la korpo.* [Rt.57] La rabo iras direkte al via homo, kiu perdos ĉion, kion li havas. *De* estus pli klara.
- *Ne dehaku **al mi** la kapon!* [FA2.101] Mi ne volas malprofiti de la dehakado.
- *Nia maljuna avino malĝojas tiel, ke la blankaj haroj **al ŝi** elfalis.* [FA1.104] Ŝiaj blankaj haroj elfalis de ŝia kapo.
- *La aŭto estis ŝtelita **al mi**. = ... ŝtelita disde mi/el de mi*. Ĉi tie simpla *de* tamen donus malĝustan signifon, nome ke mi ŝtelis la aŭton: §12.3.2.4.

Ĉi tia uzo de *al* estis sufiĉe ofta ĉe Zamenhof, sed fariĝis nuntempe iom malpli ofta. Kiam ne estas risko de miskompreno, oni povas tute bone uzi *al* en tiaj esprimoj.

### Spertanto, sentanto

*Al* povas montri tiun, kiu spertas aŭ sentas ion:

- *La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis **al ŝi**.* [FE.17]
- *Ŝajnas **al mi**, ke el ŝia buŝo elsaltas perloj kaj diamantoj.* [FE.17]
- *Estas **al mi** malvarme kaj tiel malseke!* [FA1.55] *≈ Mi sentas malvarmon kaj malsekon.*
- *Artikoloj talente skribitaj plaĉos **al la gazeto** kaj **al ĝiaj legantoj**.* [OV.99]
- *Vi estis **al mi** tre kara.* [Sm2.1]
- *Ĉu ne estus **al vi** agrable havi tian saman kapablon?* [FE.17]
- *Ankaŭ **al vi**, mia kara Hermano, li sentigos sian skurĝon.* [Rt.41]
- *Granda parto de la alta literatura lingvo* [...] *estas **al vi** videble tre malmulte konata.* [M.135] Ĉi tie oni ankaŭ povas uzi *de*, ĉar temas pri aganto ĉe pasiva participo (§12.3.2.4).
- *Estu sciate **al la reĝo**, ke ni iris en la Judan landon.* [Ez.5]

### Posedanto

*Al* montras posedanton kaj similajn signifojn ĉe la verbo *aparteni*:

- *La rozo apartenas **al Teodoro**.* [FE.5] *= La rozo estas de Teodoro. La rozo estas lia.*
- *Li apartenis **al tiuj tre maloftaj homoj**, kiuj faras ĉion silente.* [OV.246] *= Li estis unu el tiuj tre maloftaj homoj ...*

### *Al* anstataŭ N-finaĵo

Ĉe aga O-vorto *al* povas iafoje montri sencan objekton: §12.3.2.2.

### Rezulto de ŝanĝo

Iafoje oni montras per *al* rezulton de transformado aŭ ŝanĝado: *Li disrompis ĝin **al mil pecoj***. Normale oni uzas *en* + N-finaĵon (§12.3.4.6). Oni renkontas tiusignife ankaŭ *je* (§12.3.1).

### Aldono, adicio

Kune kun verboj kiel *aligi*, *aliĝi*, *aldoni* k.t.p., *al* povas montri aldonon, adicion k.s.:

- *La junulo aliĝis **al nia militistaro** kaj kuraĝe batalis kune kun ni kontraŭ niaj malamikoj.* [FE.39] Li fariĝis parto de la militistaro.

Iam oni uzis *al tio* anstataŭ aldonsignifa *krom tio* (§12.3.6.3):

- *Ĝi havis tiel same grandan sukceson, kiel la efektiva najtingalo, kaj **al tio** ĝi havis multe pli belan eksteraĵon.* [FA2.28] Nun oni diras nur *krom tio* aŭ *krome*.

### Tempo

*Al* iafoje montras okazon (precipe feston), kiam oni parolas pri speciala ago pro tiu okazo (donacado k.s.):

- *Al **Kristnasko** venis letero de ŝia patro.* [FA3.58] = *Okaze de Kristnasko ... Je Kristnasko, kaj ĝuste pro tio ke estis Kristnasko ...*
- *Akceptu ankaŭ de mia flanko plej koran gratulon **al la nova jaro**.* [OV.491] = *... okaze de la nova jaro.*

*Al* troviĝas ankaŭ en esprimoj kiel *de tempo al tempo* = "iafoje, kelkfoje"; *de tago al tago* = "ĉiutage, laŭ pasado de la tagoj". Ili estas figuraj esprimoj faritaj laŭ *de loko al loko* k.s.:

- *De tempo **al tempo** li aliradis al la fenestro kaj elrigardadis.* [FA2.144]
- *De tago **al tago** la reĝido ŝin ĉiam pli ekamadis.* [FA1.99]

### Referenco

Ĉe esprimo de proksimeco, simileco k.s. *al* montras tion, kion oni konsideras, kiam oni taksas aferon proksima aŭ simila:

- *Ŝi estis jam tute proksima **al la preĝejoj**.* [FA1.169] = *Ŝi estis jam en la proksimo de la preĝejo.*
- *Pli proksime **al la fenestroj*** [...] *prenis al si lokon laboristinoj pli junaj.* [M.112]
- *La pli maljuna estis tiel simila **al la patrino** per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon.* [FE.11]
- *Tio estis vivmaniero certe ne konforma **al la reguloj de la higieno**.* [M.132]

Oni trovas ankaŭ *proksima de*, *proksime de*. Ĉe *malproksima/malproksime* oni uzas precipe *de* (§12.3.2.5). Ŝajnas logike uzi ĉiam *al* ĉe proksimeco, kaj *de* ĉe malproksimeco, sed la efektiva uzado estas miksita. Ĉe aliaj vortoj similaj al *malproksima*, oni ne uzas *al*, sed *de* (iafoje *je*): *aparta de*, *diferenca de*, *libera de/je* k.s.

### Rolvortaĵoj kun *al*

Legu ankaŭ pri rolvortaĵoj kiel *responde al*, *konforme al*: §12.3.7.

### Vortfarado

- *Aligi* = "aldoni, almeti": *Nur tiam ni povas esperi pli aŭ malpli frue **aligi** al nia afero la grandegan indiferentan amason de la publiko.* [OV.93]
- *Aliĝi* = "aldoniĝi, almetiĝi, aniĝi, aparteniĝi": *Se gut' al guto **aliĝas**, maro fariĝas.* [PE.981] *Ĉiutage **aliĝas** al Esperanto multaj novaj personoj en ĉiuj landoj de la mondo.* [L2.73] *Ĉu vi **aliĝis** al la kongreso?*

### 12.3.5.2. *El*

#### Movo

*El* montras movon for de interno al ekstero:

- ***El la kaldrono**, en kiu sin trovas bolanta akvo, eliras vaporo.* [FE.25] La vaporo iras for de la interno de la kaldrono.
- *Li eliris **el la dormoĉambro** kaj eniris en la manĝoĉambron.* [FE.31]
- *Mia patrino forpelis min **el la domo**.* [FE.21]
- *Ŝi vidis unu sinjorinon, tre riĉe vestitan, kiu eliris **el la arbaro**.* [FE.19]
- *Li venigis al si **el Berlino** multajn librojn.* [FE.39] = *... de la interno de Berlino ...*
- *La lasta espero malaperis **el la animo de la bela Sara**.* [Rn.40]
- *Vi eksiĝis **el la movado**.* [L2.304]
- *Mi ĝin bedaŭras **el la tuta koro**.* [H.37] = *... bedaŭras plenkore, tute sincere.* La bedaŭro venas kvazaŭ el ĉiuj partoj de la koro.
- ***El sub la kanapo** la muso kuris.* [FE.26] *El* estas ofte uzata kune kun diversaj lokaj rolvortetoj (§12.3.4) por pli ekzakte montri la lokon, el kiu io moviĝas.
- *Mi petas vin, sinjorina moŝto, – diris la juvelisto **el malantaŭ la tablo**.* [M.187] La loko malantaŭ la tablo estas rigardata kiel spaco kun interno. Oni ankaŭ povus uzi *de* (§12.3.2.1).
- *Iru en la domon de la malĉastistino, kaj elkonduku **el tie** la virinon, kaj ĉiujn, kiuj estas ĉe ŝi.* [Js.6]
- *Tie interne estis mallume, almenaŭ en la antaŭa ĉambro, – **el interne** estis aŭdata muziko.* [FA2.134]

#### Antaŭa stato

*El* povas montri antaŭan staton, kiam temas pri ŝanĝiĝo. Ofte temas pri figura uzo de la baza mova senco de *el*:

- *Unu el ili eksaltis **el sia dormo** kiel sovaĝa besto.* [FA3.15] Li subite vekiĝis.
- *Marta rapide kaj kvazaŭ vekite **el longa dormo** kaptis la manon de la kudristino.* [M.103]
- *Ŝi videble sentis la en ĉiu homo denature troviĝantan deziron eltiri sin **el mizero**.* [M.119]
- ***El la knabo** fariĝis junulo, kaj li devis forveturi en la malproksiman mondon.* [FA2.82] Li ŝanĝiĝis de knaba stato en junulan staton.
- *Vi iam vidos, kio **el tio*** [= pomkerno] *fariĝos; **el tio** fariĝos io, pri kio vi certe ne pensas, tuta pomarbo, sed ne tuj.* [FA3.141]
- *Vi faris **el mi** la plej malfeliĉan mizerulon en la mondo.* [Rt.104] = *Pro via faro mi fariĝis la plej malfeliĉa mizerulo en la mondo.*

## Deveno

*El* ofte montras devenon, originon aŭ fonton:

- ***El kie*** *vi estas?* FA2.37 = *De kiu loko vi devenas? Kie estas via origina loko?*
- *Kelkaj el la Esperantaj idiotismoj estas prenitaj ankaŭ **el la lingvoj slavaj** (dum aliaj estas prenitaj **el aliaj lingvoj**).* LR.149A
- *Tradukoj **el ĉi tiu lingvo** estus pli dezirataj kaj pli bone pagataj.* M.127
- *Kiom mi povis vidi **el via laboro**, tiu via senduba talento restas* [...] *en stato rudimenta.* M.135 La fonto de lia konstato estas ŝia laboro, kiun li vidis.
- *S*ro *L. de Beaufront nur legis eltiron **el tiu ĉi artikolo**.* LR.147
- *Tie la floroj kaj la folioj kantis la plej belajn melodiojn **el lia infaneco**.* FA1.190
- *La infano alsidiĝis al lito kaj laŭte legis **el la libro**.* FA3.25

## Materialo

*El* estas la normala rolvorteto por montri materialon. Tiu signifo estas varianto de devena *el*:

- *La reĝino iris en banejon, kiu estis konstruita **el marmoro**.* FA1.160
- *Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam estas faritaj **el tolo**.* FE.35
- *Nenian trinkaĵon **el vinberoj** li devas trinki.* Nm.6
- *Freŝa viando kostas multe, kaj por pretigi **el ĝi** manĝon oni devas ankaŭ forbruligi multe da ligno.* M.64
- *Al mi donu la plezuregon, ke mi faru **el li** kaĉon!* Rt.70
- ***El la diritaj vortoj*** *ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj.* FE.30

## Distingo de individuoj aŭ de parto

Tre ofte *el* montras grupon aŭ amason, kiam oni distingas aŭ apartigas iujn individuojn de la grupo, aŭ parton de la amaso. Tion oni povas rigardi kiel figuran uzadon de la baza elmova signifo. Oni kvazaŭ elprenas membrojn aŭ partojn por aparta konsidero:

- ***El ĉiuj miaj infanoj*** *Ernesto estas la plej juna.* FE.10 Ernesto apartenas al la grupo "ĉiuj miaj infanoj". Inter ili li estas la plej juna.
- ***El ŝiaj multaj infanoj*** *unuj estas bonaj kaj aliaj estas malbonaj.* FE.12
- *Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn, kaj al ĉiu **el la infanoj** mi donis po tri pomoj.* FE.14
- ***El la tri leteroj*** *unu estis adresita: al Lia Episkopa Moŝto, Sinjoro N.; la dua: al Lia Grafa Moŝto, Sinjoro P.; la tria: al Lia Moŝto, Sinjoro D.* FE.42
- *Multaj **el niaj amikoj** ne volas pacience atendi kaj labori.* OV.59
- *Tio estis la plej bela horo **el mia vivo**!* FA3.67 Aŭ *de mia vivo, en mia vivo*.

- *Trinku **el la vino**, kiun mi enverŝis.* [SS.6] = *Trinku iom de la vino ...*
- *Li nenion povis rememori **el sia sonĝo**.* [FA2.133]

Ankaŭ *inter* povas montri apartenon al grupo (§12.3.4.7). Iafoje oni renkontas tiusence la pezan esprimon *el inter*: *Li estas unu el inter ili.* Tute bone sufiĉas sola *el*: *Li estas unu el ili*.

Speciala varianto de tiu ĉi signifo estas konsisto:

- *Mia skribilaro konsistas **el inkujo, sablujo, kelke da plumoj, krajono kaj inksorbilo**.* [FE.34]
- *Unu minuto konsistas **el sesdek sekundoj**.* [FE.12]

Kiam *konsisti* montras la esencan parton de io abstrakta, oni plej ofte ne uzas *el*, sed anstataŭe *en* (§12.3.4.6): *La dua distingiĝa eco de lingvo arta estas ĝia perfekteco, kiu konsistas **en matematika precizeco, fleksebleco kaj senlima riĉeco**.* [FK.276]

### Kaŭzo

Por kaŭzo oni uzas normale *pro* (§12.3.6.11), sed kiam oni volas montri kaŭzon figure kiel devenon aŭ fonton, oni povas uzi *el*:

- *Ni restas sen rimedoj kaj lacaj kaj devas **el manko de fortoj** ĉesigi la eliradon de nia organo.* [OV.125] = *... pro manko de fortoj ...*
- *Clemency **el surprizo** pro tiu ĉi demando preskaŭ renversis la pleton de teo.* [BV.83] *El* sonas pli bone ol *pro* ĉi tie, ĉar *pro* aperas tuj poste.
- *Unu sinjoro* [...] *en la komenco estis forte kolera kontraŭ ĝi **el la kaŭzo, ke ĝi "ne estas sufiĉe internacia"**.* [LR.51A] = *... kolera kontraŭ ĝi pro tio, ke ĝi ... ... kolera kontraŭ ĝi, ĉar ĝi ...*

Komparu kun simila uzo de *de* (§12.3.2.1).

### Vortfarado

- *Eligi* = "irigi el io": *Ĝi estas dramo, miaj fratoj, kiu **eligas** larmojn el viaj okuloj.* [Rt.80] *La alumeto **eligis** varman helan flamon.* (= *... eligis el si ...*).
- *Eliĝi* = "iri el io": *La ambaŭ virinoj kaj la infano **eliĝis** el veturilo antaŭ unu el la domoj ĉe la strato Piwna.* [M.6] *Mi ĝis nun ne kuraĝis demandi vin,* [...] *kiamaniere vi sukcesis **eliĝi** el la malriĉeco.* [M.156]

*El* estas ankaŭ uzata prefiksece: §38.4.2.

## 12.3.5.3. *Ĝis*

### Limo de movo

*Ĝis* montras lokon, kiun ia movo atingas, sed ne pasas:

- *Niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin **ĝis ilia domo**.* [FE.18] Post alveno al ilia domo niaj fratoj ne plu akompanis ilin.
- *Li kliniĝis **ĝis la tero**.* [FA2.99]
- ***Ĝis ĉi tie** aliru, sed ne plu.* [Ij.38]

- ***Ĝis kie** ni iros hodiaŭ?*
- *De supre **ĝis malsupre** la kastelo estis fendiĝinta.* [FA2.67]
- *Starigu nun la kaldronon kaj plenigu ĝin per akvo **ĝis la rando**.* [FA3.137]
- *La fraŭlineto ruĝiĝis **ĝis la haroj kaj oreloj**.* [M.175]

### Limo sen movo

*Ĝis* ankaŭ povas montri limon de spaco, tereno aŭ simile:

- *La tuta Sundo **ĝis la Sveda bordo** estas kovrita de glacio.* [FA2.109] La sveda bordo estas limo de la glacio.
- *Ĉapo el ursa felo sidis sur lia kapo **ĝis sub la oreloj**.* [FA1.181] La rando de la ĉapo troviĝis sub la oreloj.
- *En forte pluva aŭtuna tago li piede ekiris la vojon.* [...] *malseka **ĝis la haŭto** li la unuan fojon eniris en Kopenhagon.* [FA3.59] La haŭto estis limo de la malseko en liaj vestaĵoj.
- ***Ĝis la arbaro** estas sufiĉe malproksime.* [FA3.56]

### Tempo

*Ĝis* ofte montras tempon, kiun io atingas, sed ne pasas:

- *Mi laboras ĉiutage de frua mateno **ĝis malfrua vespero**.* [L1.73] Post malfrua vespero mi ne plu laboras.
- *Ĵuru al mi fidelecon kaj obeadon **ĝis la morto**!* [Rt.30] Nur post la morto povas ĉesi via fideleco kaj obeado.
- *Mi eltenos **ĝis la fino**.* [Rt.115]
- *Ili trinkis **ĝis malfrue** en la nokto.* [FA1.17]
- *Nu, atendu **ĝis morgaŭ**.* [FA1.154]
- ***Ĝis (la) revido**!* aŭ simple *Ĝis (la)!* ≈ *Ĝis nia venonta revido mi memoros vin!*
- ***Ĝis kiam** vi rifuzos humiliĝi antaŭ Mi?* [Er.10] = *Ĝis kiu tempo vi daŭrigos rifuzi* ... Rimarku, ke *ĝis* antaŭ demanda *kiam* (§33.4.2) estas bona uzo, dum *ĝis* antaŭ nedemanda *kiam*-frazo (§33.7) estas malbona.

Speciala uzo de tempa *ĝis* estas montrado de lasta tempo por fini taskon. Tiam *ĝis* signifas "ne pli malfrue ol". La montrita tempo estas mem inkluzivita, sed post ĝi estos tro malfrue:

- *La tuta traduko estu nepre preta **ĝis la fino de Majo**.* [OV.563] = ... *preta ne pli malfrue ol la fino de Majo. Estu preta* devas ĉi tie kompreniĝi kiel *fariĝu preta*, *estu pretigita*. Ĉi tia uzo de *ĝis* estas speciala konvencio. Se tiu konvencio ne ekzistus, oni komprenus, ke la traduko estu preta dum la tuta tempo ĝis la fino de Majo, kaj ke ĝi tiam ĉesu esti preta.
- *Ĝi devis esti preta **ĝis sabato**, kaj tio ne estis tre facila. Kiam ĝi estis preta, estis jam ĝuste sabato.* [FA1.199] Li do sukcesis pri la tasko.
- *Pro kelkaj kaŭzoj la angla eldono ne povis esti preta **ĝis hodiaŭ**.* [OV.488] Oni ne sukcesis ĝis tiu tempo.

- *Ĉiu, kiu deziras partopreni en la konkurso, devas sendi ne pli malfrue ol* ***ĝis la 1ª Decembro 1895*** [...] *raporton.* [OV.200] Ĉi tie Zamenhof esprimis dufoje la saman sencon. Oni povus aŭ forigi *ne pli malfrue ol*, aŭ anstataŭigi *ĝis* per N-finaĵo.

Ankaŭ estas eble uzi *antaŭ* (§12.3.4.1) en ĉi tiaj frazoj, sed tiam la montrita tempo ne estas inkluzivita: *Ĝi devas esti preta antaŭ sabato.* Sabate estos jam tro malfrue. Komparu ankaŭ kun tempa *por* (§12.3.6.9).

### Atingo de mezuro, grado, nivelo, stato

*Ĝis* povas montri ian mezuron, gradon, nivelon aŭ staton, kiun io atingas:

- *Per konkura marĉando la prezo falis* ***ĝis tri bacoj****.* [Rt.18]
- *Longigu Dio la vivon* ***ĝis ekstrema mezuro!*** [Rz.90]
- *Ŝi forigu la malĉastecon de sia vizaĝo kaj la adultemecon de siaj mamoj, por ke Mi ne senvestigu ŝin* ***ĝis nudeco****.* [Hŝ.2]

### Ekstremo sur skalo

*Ĝis* povas montri unu ekstremon de ia skalo aŭ hierarĥio, dum *de* montras la alian ekstremon:

- *Precipe ŝi amis la rozojn, kaj tial ŝi havis la plej diversajn specojn de ili,* ***de la sovaĝaj, simple odorantaj, ĝis la plej belaj luksaj rozoj****.* [FA3.24] Ŝi havas ĉiujn specojn, sovaĝajn, luksajn, kaj ĉiujn aliajn specojn inter tiuj du ekstremoj.
- *Ne plu estos loĝanto en ĝi:* ***de homo ĝis bruto*** *ĉio foriĝos kaj foriros.* [Jr.50] Ĉiuj homoj, ĉiuj brutoj, kaj ĉio alia inter tiuj du limoj, foriĝos kaj foriros. Oni subkomprenas ian hierarĥion de homoj kaj brutoj.
- *Ekzistas ankaŭ* [...] *lernolibroj, kiuj* [...] *kostas* ***de 15 ĝis 50 centimoj*** *por ekzemplero.* [OV.163] La plej malalta prezo estas 15 centimoj, la plej alta estas 50, sed ekzistas ankaŭ prezoj inter tiuj du ekstremoj. En ĉi tiaj esprimoj oni ofte forlasas *de*: *Ili kostas 15 ĝis 50 centimoj(n).*

Legu pli pri *de* kaj *ĝis* rilate al nombraj kaj kvantaj vortoj en §23.6.

### *Ĝis* inkluzivas

Esprimo kun *ĝis* normale inkluzivas ankaŭ la *ĝis*-aferon. Se iu petas, ke oni nombru de 1 ĝis 5, oni diru: *1, 2, 3, 4, 5* (la kvino estu inkluzivita). Iafoje por emfazi la inkluzivan signifon oni povas aldoni la vorton *inkluzive*: *Ili loĝas en apartamentoj 101* ***ĝis*** *150* ***inkluzive****.* Oni povus ankaŭ uzi *ĝis kaj kun*: *... en apartamentoj 101* ***ĝis kaj kun*** *150.*

Se iam oni volus ekskluzivi la *ĝis*-aferon, oni povus aldoni *ekskluzive*: *Ili kostas de 10* ***ĝis*** *20 dolarojn* ***ekskluzive****.* (La plej alta prezo estas 19,99 doloj.) Tiaj esprimoj estas tamen tre malofte bezonataj.

### Frazenkondukilo

*Ĝis* estas ankaŭ frazenkondukilo (§33.7). Tiam *ĝis* rilatas al tuta frazo: *Mi ploris, **ĝis mi endormiĝis**.* [FA1.229]

### Vortfarado

- *Ĝisi* = "diri ĝis (la revido)!, adiaŭi": *Post la kongreso ĉiuj **ĝisis**, kaj iris hejmen.*
- *Ĝiso* = "eldiro de la frazo ĝis (la revido)!": *Sekvis **ĝisoj** kaj kisoj. Poste ĉiuj foriris.*

## 12.3.6. Aliaj rolvortetoj

### 12.3.6.1. *Anstataŭ*

*Anstataŭ* montras ion, kies rolon plenumas io alia, aŭ ion, en kies loko estas io alia. *Anstataŭ* havas do iaspecan nean valoron:

- ***Anstataŭ kafo** li donis al mi teon kun sukero, sed sen kremo.* [FE.26] Li ne donis kafon, sed ja teon. La rolon de kafo (kiel trinkaĵo) plenumis teo.
- *Abraham iris kaj prenis la virŝafon, kaj oferis ĝin kiel bruloferon **anstataŭ sia filo**.* [Gn.22] Li ne oferis sian filon, sed virŝafon.
- *Marta ekrigardis ĉirkaŭen per okuloj, en kiuj **anstataŭ la antaŭmomenta malĝojeco kaj laceco** aperis denove energio kaj esploremeco.* [M.119] Antaŭe estis malĝojeco kaj laceco en la okuloj. Nun estis tie energio kaj esploremo.
- *Kiam mortis Jobab, ekreĝis **anstataŭ li** Ĥuŝam el la lando de la Temananoj.* [Gn.36]
- *Ŝi **anstataŭ dezirata laboro** ricevis almozon!* [M.192]
- ***Anstataŭ matene**, mi nun hejtados la fornon tagmeze.* [M.64] Mi ne plu hejtados matene, sed tagmeze.
- ***Anstataŭ ĉia respondo** la maljunulino nee skuis la kapon.* [M.24] Ŝi ne donis veran respondon, sed kapskuo servis kiel respondo.

### Antaŭ *ke*-frazo

Oni uzas *anstataŭ* ankaŭ antaŭ *ke*-frazo (§33.2.3), sed normale oni intermetas helpan *tio*:

- *Ĉu mi ne helpu vin, **anstataŭ tio, ke vi sola faru la tutan laboron**?* Nun la intenco estas, ke vi sola faru la tutan laboron. Ĉu ne anstataŭ tio mi helpu vin?

Iafoje oni forlasas *tio*:

- ***Anstataŭ ke ĉiu lernas diversajn lingvojn**, ĉiuj ellernadu unu saman lingvon.* [FK.263]

### Antaŭ I-verbo

Ofte oni metas *anstataŭ* antaŭ I-verbo: §27.5.

### *Anstataŭ* + aliaj rolmontriloj

*Anstataŭ* estas iom aparta rolmontrilo, ke ĝi fakte tute ne montras frazrolon! Ĝi nur montras, ke io alia plenumas la rolon de la afero, sed ĉu tiu transprenita rolo estas rolo de subjekto, objekto aŭ ia komplemento, tion *anstataŭ* tute ne montras. Kutime la kunteksto montras, al kia frazrolo la *anstataŭ*-afero respondas. Je bezono oni povas tamen aldoni alian rolmontrilon, kiu montras la rolon de la *anstataŭ*-esprimo:

- *Li faris tion pro ŝi* ***anstataŭ pro mi****.* Se oni dirus *anstataŭ mi*, ŝajnus, ke li anstataŭas min kiel aganton, ke li faris tion anstataŭ tio, ke mi farus tion. *Pro* montras, ke *mi* ludas rolon de “kaŭzo”, kaj ke ŝi anstataŭas min en tiu rolo.
- *Ĉiun, kiu* [...] *petos ion de ia dio aŭ homo* ***anstataŭ de vi****, ho reĝo, oni ĵetu en kavon de leonoj.* [Dn.6] Sen *de* ŝajnus, ke la petanto anstataŭas vin kiel petanton, ke li petus anstataŭ tio, ke vi petus.
- *Petro batis Paŭlon* ***anstataŭ Vilhelmon****.* [LR.77] = Petro batis ne Vilhelmon, sed Paŭlon. Komparu kun: *Petro batis Paŭlon* ***anstataŭ Vilhelmo****.* = Ne Vilhelmo, sed Petro batis Paŭlon.
- *Ili veturis al Londono* ***anstataŭ al Bath****.* Se oni scias, ke Bath estas urbo, oni bone komprenas la frazon ankaŭ, se oni dirus simple *anstataŭ Bath*, sed se oni ne scias, ĉu Bath estas urbo aŭ eble persono, oni povus pensi, ke ili veturis tien anstataŭ tio, ke ia sinjoro Bath veturus tien.
- *Neniu povas protesti, se vi skribos ekzemple per artifikaj gotaj literoj* ***anstataŭ per literoj ordinaraj****.* [LR.60] La aldonita *per* ŝajnas superflua, ĉar *literoj ordinaraj* apenaŭ povus ludi alian rolon ol rimedo ĉi tie.

Aldonajn rolmontrilojn oni uzu nur kiam tio estas bezonata por klareco. Plej ofte simpla *anstataŭ* sufiĉas. Komparu kun *krom* (§12.3.6.3).

Tradicie oni klarigas tion ĉi per subkomprenata I-verbo: ... *anstataŭ fari tion pro mi. ... anstataŭ peti de vi ... ... anstataŭ bati Vilhelmon. ... anstataŭ veturi al Bath. ... anstataŭ skribi per literoj ordinaraj.*

### Anstataŭ *anstataŭ*

La radiko VIC havas en prefikseca uzo signifon similan al *anstataŭ* (§38.4.1). Oni tial proponis *vice al* aŭ *vic' al* kiel alternativon al *anstataŭ*. *Vic' al* estas farita laŭ la modelo de *dank' al* (§10.1). Kvankam tiuj alternativoj estas sufiĉe tuj kompreneblaj, ili ne fariĝis popularaj. Normale oni uzu *anstataŭ*, sed almenaŭ en poezio oni ja povas provi *vice al* aŭ *vic' al*.

Zamenhof uzis kelkfoje *pro* anstataŭ *anstataŭ* (§12.3.6.11).

### Vortfarado

- *Anstataŭa* = “tia, ke ĝi servas (aŭ povas servi) anstataŭ io, surogata”: *Rompiĝis unu el la radoj de nia aŭto, kaj ni devis almeti la* ***anstataŭan*** *radon.*

- *Anstataŭe* = "anstataŭ tio": *Li ne donis al mi kafon.* ***Anstataŭe*** *li donis teon.*
- *Anstataŭi* = "esti (servi, roli ...) anstataŭ io": *Ne tiel baldaŭ ankoraŭ troviĝos persono, kiu volus kaj povus min* ***anstataŭi*** *en la diversaj multaj laboroj por nia afero.* OV.126 (= ... *povus servi anstataŭ mi* ...) *La patro kaj la fratoj* ***anstataŭis*** *al ŝi la okulojn* [...]*, ke ŝi povis pensi, ke ŝi vidas per propraj okuloj.* FA3.116 (Ili servis kiel ŝiaj okuloj.)
- *Anstataŭigi* = "meti ion anstataŭ io alia, doni al io la rolon de io alia": *Ĉiu pli granda magazeno por siaj bezonoj uzas virojn, kaj kiu iam provis* ***anstataŭigi*** *ilin per virinoj, havis grandan malprofiton.* M.89

Ne konfuzu *anstataŭi* kaj *anstataŭigi*. Ambaŭ estas objektaj verboj, sed tio, kio anstataŭas, mem servas anstataŭ io, dum tio, kio anstataŭigas, metas ion anstataŭ io alia.

### 12.3.6.2. *Dum*

*Dum* montras tempodaŭron, = "en la daŭro de". *Dum* staras antaŭ tempa aŭ aga esprimo:

- *Tondroj bruadis* ***dum la tuta nokto****.* FA1.77
- *Ŝi ne ŝanceliĝis kiel antaŭ kelke da horoj, ne puŝiĝis je la krutaj ŝtupoj kaj ne haltis* ***dum la irado*** *por reakiri spiron.* M.194
- ***Dum multe da semajnoj*** *la suno lumas ĉiutage apenaŭ kelke da horoj.* M.200
- *Estis tie tiel lume, preskaŭ kiel* ***dum la tago****.* M.200
- ***Dum la vojo*** *Klaro parolis al Marta.* M.104 La vorto *vojo* normale ne estas aga aŭ tempa, sed ĉi tie ĝi reprezentas iradon laŭ vojo.

Legu pri la diferenco inter *dum* kaj tempa *en* en §12.3.4.6. Legu ankaŭ pri tempa *tra* en §12.3.4.14, kaj tempa *por* en §12.3.6.9.

#### Frazenkondukilo

*Dum* estas ankaŭ frazenkondukilo (§33.7): *Forĝu feron* ***dum ĝi estas varmega****.* PE.525 Tio estas eĉ la origina uzo de *dum*. Komence *dum* tute ne estis uzata kiel rolvorteto.

#### Vortfarado

- *Dume* = 1. "Dum tiu tempo": *Mi iros ĝin akiri en la urbo!* ***dume*** *sidu iom ĉe mia malsana infano!* M.198 2. "Provizore, ĝis pli ĝusta tempo": *La verketo eliras* ***dume*** *nur en lingvo rusa, kaj poste ni penos, ke ĝi iom post iom eliru ankaŭ en aliaj lingvoj.* OV.156 3. "kontraste al tio, kontraŭe": *La ekposedo de ĉio tio ĉi* [= verboformoj en naciaj lingvoj] *postulas inferan paciencon* [...]. ***Dume*** *lingvo arta anstataŭ tiu ĉi tuta ĥaoso* [...] *donas al vi sole nur 6 vortetojn "i, as, is, os, us, u".* FK.272

### 12.3.6.3. *Krom*

*Krom* montras aferon, kiun oni konsideras aparte. Tiu baza signifo donas praktike du signifojn: **escepta** *krom* kaj **aldona** *krom*. La diferenco inter tiuj du signifoj estas tre granda, kaj tio iafoje povas krei riskon de miskompreno.

#### Escepta *krom*

Escepta *krom* montras ion, por kio la cetero de la frazo ne validas.

Se la frazo estas pozitiva, la senco de escepta *krom* estas negativa. Tia pozitiva frazo normale enhavas *ĉiu(j)*, *ĉio* aŭ *tuta*:

- *Tie estis ĉiuj miaj fratoj **krom Petro**.* [LR.136] Petro **ne** estis tie.
- ***Krom la studento** ĉiuj estis en la lito.* [FA3.52] La studento **ne** estis en la lito.
- *Ĉiun homon, kiu* [...] *petos ion de ia dio aŭ homo **krom vi**, ho reĝo, oni ĵetu en kavon de leonoj.* [Dn.6] Se iu petos de vi, tiun oni tamen **ne** ĵetu en kavon de leonoj.
- *Ĉio en ŝi estis juna kaj almenaŭ ŝajne serena, **krom la frunto**.* [M.150] La frunto **ne** estis tia.
- *La tuta teksto estas ĝusta, **krom unu frazo**.* Unu frazo **ne** estas ĝusta.
- *La tuta popolamaso disiĝis **krom malgranda grupo**.* Malgranda grupo **ne** disiĝis.

Se la frazo estas negativa (kun *ne*, NENI-vorto aŭ *sen*), la senco de escepta *krom* estas pozitiva:

- *En la salono estis neniu **krom li kaj lia fianĉino**.* [FE.26] Li kaj lia fianĉino **ja** estis tie.
- *Ne ekzistas Dio **krom Mi**.* [Re.32] Mi estas Dio, kaj mi **ja** ekzistas.
- *La pioniroj de novaj ideoj renkontas nenion **krom mokoj kaj atakoj**.* [FK.253] Mokojn kaj atakojn ili **ja** renkontas.
- *Ĝiaj vortoj* [= la vortoj de Esperanto] – ***krom kelkaj tre malmultaj*** – *ne estas arbitre elpensitaj.* [FK.284] Kelkaj malmultaj **ja** estas arbitre elpensitaj.
- *En la lastaj monatoj mi, **krom miaj profesiaj bezonoj**, preskaŭ neniam eliras el la domo.* [L1.241] Okaze de profesiaj bezonoj mi **ja** eliras. (Oni povas por klareco diri *krom **pro** miaj profesiaj bezonoj*, sed vidu ĉi-poste pri *krom* + aliaj rolmontriloj.)
- *Marta kuŝis sur la malmola litaĵo* [...] *sen ia alia sento **krom morta laciĝo**.* [M.193] Mortan laciĝon ŝi **ja** sentis.
- ***Krom tiu mono*** [...] *ŝi havas jam nenian alian.* [M.62] Tiun monon ŝi **ja** havas.

Post *nenio alia*, *nenio pli*, *neniu alia*, *neniu pli* k.s. oni povas ankaŭ uzi *ol* (§20.1): *La domoj estis nenio alia **krom lignaj budoj**.* = *La domoj estis nenio alia **ol lignaj budoj**.* [FA3.138]

## Aldona *krom*

Aldona *krom* montras ion, kio ja validas. Al tio oni (poste) aldonas ion alian, kio ankaŭ validas. Normale *ankaŭ* (eventuale *ankoraŭ* aŭ *eĉ*) ĉeestas en la frazo por fortigi la aldonan sencon:

- ***Krom Petro*** *tie estis ankaŭ ĉiuj aliaj miaj fratoj.* [LR.136] *= Aldone al Petro ankaŭ ili estis tie.*
- *Per pruntedono ofte oni perdas* ***krom sia havo*** *ankaŭ la amikon.* [H.24] *= Aldone al tio, ke oni perdas sian havon, oni perdas ankaŭ la amikon.*
- ***Krom mi*** *restis ĉe la patrino du miaj pli junaj fratoj.* [M.101] *= Aldone al mi, ankaŭ ili restis tie.*
- *Ĉu vi provis jam ian alian laboron* ***krom tiu, kiu alportas al vi tiel mizeran rekompencon****?* [M.125] *= Ĉu vi jam provis ankaŭ alian laboron aldone al tiu, kiu ...?*
- *La luno ne leviĝis ankoraŭ sufiĉe alte,* ***krom tio*** *estis iom da nebulo.* [FA1.116] *= Aldone al tio, ke la luno ne leviĝis sufiĉe, estis ankaŭ iom da nebulo.*
- *Ĝi* [= la ofico] *ne estas ankaŭ facila, kaj* ***krom tio*** *mi dubas, ĉu ĝi estus oportuna por vi.* [M.30] *= Aldone al tio, ke ĝi ne estas facila, mi dubas ankaŭ, ĉu ĝi estus oportuna por vi.*
- *La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco, estis* ***krom tio*** *unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi.* [FE.11] *= Aldone al tio, ke ŝi estis simila al la patro, ŝi estis ankaŭ bela.*
- ***Krom Karlo****, venis eĉ lia tuta familio. = Aldone al tio, ke venis Karlo ...*
- *Vi estis por mi tiel bona, ke* ***krom nehonesta*** *mi estus ankoraŭ sendanka, se mi...* [M.58] *= ... al nehonesteco aldoniĝus ankoraŭ sendankeco, se mi ...*

Aldona *krom* estas normale ĉiam pozitiva, kiel en ĉiuj ekzemploj ĉi-antaŭe. Sed se oni kreas negativan frazon kun *krom* kaj *ankaŭ*, *krom* ricevas negativan aldonan sencon: ***Krom Petro*** *ankaŭ Karlo ne estis tie. = Petro ne estis tie, kaj aldone ankaŭ ne Karlo.* Tiajn frazojn oni ial apenaŭ uzas en la praktiko.

### Risko de miskompreno

Normale la kunteksto klare montras, ĉu temas pri escepta aŭ aldona *krom*. Se ĉeestas *ankaŭ*, *ankoraŭ* aŭ *eĉ*, tiam *krom* estas **nepre aldona**. Se mankas tia vorto, kaj la frazo estas negativa, *krom* estas **nepre escepta**. Tamen se la frazo estas pozitiva, kaj ne ĉeestas *ankaŭ*, *ankoraŭ* aŭ *eĉ*, povas iafoje ekesti duboj: ***Krom Petro*** *tie estis ĉiuj aliaj miaj fratoj.* Ĉu Petro estis tie, aŭ ne?

Tiaj miskompreneblaj frazoj estas tre maloftaj, sed je bezono oni povas por la escepta signifo uzi anstataŭe *kun escepto de*, *escepte de*, *escept(int)e* + N-finaĵon, aŭ *ekskluzive de*. Por aldona signifo oni povas uzi *aldone al*, *inkluzive de*. Plej simple estas tamen aldoni *ankaŭ* por montri, ke *krom* estas aldona.

Oni povas anstataŭ *krom* uzi *ekster* (§12.3.4.5), kiu povas esti kaj escepta, kaj aldona, sed kiu normale nur havas pozitivan signifon. Komence Zamenhof uzis ankaŭ *al tio* (§12.3.5.1) anstataŭ *krom tio*, sed tio plene malaperis.

### Antaŭ *ke*-frazo

Oni uzas *krom* ankaŭ antaŭ *ke*-frazo (§33.2.3), sed intermetas helpan *tio*:

- ***Krom tio, ke li venis malfrue**, li eĉ kondutis tre malbone.* Aldona *krom*.
- ***Krom tio, ke la knabino, eldorlotita per baloj kaj belaj vestoj, ne havis grandan deziron labori**, montriĝis ankaŭ, ke tiu granda edukiteco, kiun la onklino al ŝi donis, havigis al ŝi nek kapon, nek manojn.* [M.102] Jam montriĝis, ke ŝi ne havas labordeziron. Aldone montriĝis, ke ŝi ankaŭ ne havas sciojn nek laborkapablon.

Iafoje oni forlasas *tio*:

- *Mi* [...] *nenion pli postulus, **krom ke oni montru al mi sindonecon kaj estimon**.* [Rz.34] Escepta pozitiva *krom*.

### Antaŭ I-verbo

Ofte oni uzas *krom* antaŭ I-verbo: §27.5.

### *Krom* + aliaj rolmontriloj

*Krom* estas iom aparta rolmontrilo, ke ĝi fakte tute ne montras frazrolon! Ĝi nur montras, ke la afero estas konsiderata aparte, sed ĉu la afero respondas al subjekto, objekto aŭ al ia komplemento, tion tute ne montras *krom*. Kutime tamen la kunteksto montras, al kia frazrolo la *krom*-afero respondas. Je bezono oni povas tamen aldoni alian rolmontrilon, kiu montras la rolon de la *krom*-esprimo:

- *Kiu alportas oferojn al dioj, **krom <u>al</u> la Eternulo sole**, tiu estu ekstermita.* [Er.22] Sen *al* ŝajnus, ke nur la Eternulo povas alporti oferojn al dioj sen esti ekstermita. *Al* estas necesa por komprenigi, ke la Eternulo estas la ricevanto de la oferoj.
- *Ne estos en ĉi tiuj jaroj roso nek pluvo, **krom <u>en</u> la okazo**, se mi tion diros.* [Rĝ1.17] *En* montras, ke *okazo* estas tempa komplemento.
- *Li sciis pri nenio, **krom nur <u>pri</u> la pano, kiun li manĝis**.* [Gn.39] Ĉi tie *pri* ŝajnas superflua. Ankaŭ sen *pri* oni bone komprenus la frazrolon de la pano.
- ***Krom Vilhelmon** Petro batis ankaŭ Paŭlon. = Krom <u>bati</u> Vilhelmon ...* N-finaĵo post *krom* estas praktike ĉiam superflua, kvankam ne erara en ĉi tiaj frazoj. Konfuzo preskaŭ neniam povas estiĝi. Ĉi tie la loko de *ankaŭ* malebligas miskomprenon. Komparu: ***Krom Vilhelmo** <u>ankaŭ</u> Petro batis Paŭlon. = Krom ke Vilhelmo batis Paŭlon, ankaŭ Petro faris tion.*

Nur tre malofte oni uzas aldonajn rolmontrilojn kune kun *krom*. Komparu kun *anstataŭ* (§12.3.6.1), kiu estas pli ofte uzata tiel, eĉ kun N-finaĵo.

Tradicie oni klarigas tion ĉi per subkomprenata I-verbo: *... krom alporti al la Eternulo sole ... ... krom scii nur pri la pano ... Krom bati Vilhelmon ...* Tia klarigo tamen ne estas ebla en la dua ekzemplo ĉi-antaŭe.

### Vortfarado

- *Kroma* = "aldona, plia, krom alia": *Por ricevi unulitan ĉambron vi devas pagi **kroman** kotizon.*
- *Krome* = "aldone, plie, krom tio": ***Krome** vi devas pagi por matenmanĝo.*

*Kroma* kaj *krome* havas ĉiam aldonan signifon, neniam esceptan.

### 12.3.6.4. *Kun*

*Kun* montras akompanon (estadon en la sama loko, moviĝon en la sama movo). *Kun* estas la malo de *sen* (§12.3.6.12). *Kun* montras aŭ tion, kio akompanas, aŭ tion, kio estas akompanata, laŭ la kunteksto:

- *Resti **kun leono** estas danĝere.* [FE.7] *= Resti en la sama loko kiel leono ...*
- *Ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi **kun ili**.* [FE.11] *= ... vivi en la sama loko kiel ili.*
- *Mi vivas **kun li** en granda amikeco.* [FE.35]
- *Ho, **kun li** oni devas esti singarda!* [Rz.32] *= ... kiam oni estas kun li ...*
- *Sur la korto staras koko **kun tri kokinoj**.* [FE.33] *= ... koko akompanata de tri kokinoj.*
- *Kiam mi ien veturas, mi neniam prenas **kun mi** multon da pakaĵo.* [FE.35]
- *Mi trinkis teon **kun kuko kaj konfitaĵo**.* [FE.35]
- *Mi vidis vian avinon **kun ŝiaj kvar nepinoj** kaj **kun mia nevino**.* [FE.33] Verŝajne la nepinoj kaj la nevino estis kun la avino, sed teorie ekzistas la eblo, ke ili estis kun mi. Eble ili ĉiuj sep estis en la sama loko.
- *Li renkontis vartistinon **kun malgranda infano**.* [FA1.198] *= ... kiu havis malgrandan infanon.* Komparu kun: *Li **kun malgranda infano** renkontis vartistinon.* La infano akompanis lin. Tamen ankaŭ la unua varianto iafoje povus signifi, ke la infano estis kun li, se la kunteksto permesus. La dua varianto estas tamen nepre unusenca.
- *Subite la kofro ekflugis **kun li** tra la kamentubo tre alten.* [FA1.197] La kofro prenis lin kun si.
- *Ĉu en ĉi tiu troviĝas kaleŝo **kun ĉevaloj**?* [FA3.89]

Ofte la *kun*-afero estas tre intime ligita al io. Ĝi povas troviĝi ene de ĝi, aŭ eĉ esti parto de ĝi:

- *Sur ĉiuj fingroj brilis ringoj **kun diamantoj**, kiuj ĉiuj estis veraj.* [FA2.136] La diamantoj estis fiksitaj al la ringoj.
- *Oni povis ankaŭ vidi tra tiu pordo vicon da ĉambroj **kun luksaj mebloj**.* [M.114] La mebloj troviĝis en la ĉambroj.
- *Vortojn **kun "um"** oni devas lerni, kiel simplajn vortojn.* [FE.42] *= Vortoj, kiuj havas la sufikson "um" kiel parton de si ...*

- *Li donis al mi teon* ***kun sukero****, sed sen kremo.* [FE.26] = *... teon, en kiu estis sukero ...*
- *Kio estas tiu granda kastelo, tuj apud la urbo,* ***kun la tiel altaj fenestroj****?* [FA1.198] = *... kiu havas la tiel altajn fenestrojn.*
- *Ĉe la fenestro sidis malgranda knabo* ***kun freŝaj ruĝaj vangoj****,* ***kun helaj, radiantaj okuloj****.* [FA2.144]
- *En la ĉambro, en kiun ŝi eniris, sidis* ***kun pipo*** *en la buŝo grizeta viro.* [M.181]
- *Tiuj bulkoj eĉ estis* ***kun sekvinberoj****.* [FA1.79]

## Farado de la sama ago

*Kun* povas montri ion, kio faras la saman agon. Tio povas esti precize la sama ago, aŭ ago kun la sama celo, aŭ ago kun reciproka celo, aŭ ago simila sed konkura, laŭ la kunteksto. Normale la *kun*-afero ankaŭ estas en la sama loko, sed ne nepre:

- *Eniru en mian varman ĉambron kaj manĝu* ***kun mi****.* Ili ambaŭ manĝu en la sama loko, verŝajne la saman manĝon.
- *Venu kune* ***kun la patro****.* [FE.8] Kaj vi, kaj la patro venu, samtempe. La aldono de *kune* plifortigas la kunecon al precize la sama loko, movo kaj celo.
- *Niaj fratoj eliris* ***kun la gastoj*** *el sia domo kaj akompanis ilin ĝis ilia domo.* [FE.18]
- *Ŝi edziniĝis* ***kun sia kuzo****, kvankam ŝiaj gepatroj volis ŝin edzinigi* ***kun alia persono****.* [FE.39] Reciproka kunagado. Ŝi edziniĝis al la kuzo, kaj la kuzo edziĝis al ŝi.
- *La junulo aliĝis al nia militistaro kaj kuraĝe batalis kune* ***kun ni*** *kontraŭ niaj malamikoj.* [FE.39] Li batalis sur la sama flanko kontraŭ la sama malamiko.
- *Se li povos batali* ***kun mi*** *kaj venkos min, tiam ni estos viaj sklavoj.* [Sm1.17] Ili batalos en la sama batalo, sed por malsamaj celoj. Ili batalos unu kontraŭ la alia. Por klareco oni povas uzi *kontraŭ* (§12.3.4.8) anstataŭ *kun*.
- *La jura konsilisto Knap defendis tiun opinion tiel fervore, ke la mastrino tuj konsentis* ***kun li****.* [FA1.113] Ŝi ekhavis la saman opinion kiel li.
- *Ĝuste hieraŭ ni parolis* ***kun vi****.* [M.96] Ni parolis al vi, kaj vi parolis al ni.
- *Du iliaj faskoj* [= de ŝiaj haroj]*, karbonigraj kaj krispaj, pendis nun sur ŝia frunto, kiu per sia plena paleco malgaje kontrastis* ***kun la ruĝo sur la vangoj****.* [M.56] La frunto kontrastis al la vangoj, kaj reciproke.

## Proksimigo, rilatigo

*Kun* povas montri abstraktan rilatigon aŭ proksimigon:

- *Multaj personoj intermiksas mian nomon* ***kun la nomoj de miaj fratoj****.* [OV.431] La diversaj nomoj estas en la pensoj tiel proksimaj unu kun la alia, ke oni ne povas ilin distingi.

- *Sur la vizaĝo oni povis vidi konfuzon, ligitan **kun tiu sama kompato**, kiu sonis en la voĉo!* M.135 La konfuzo kaj la kompato estas kunigitaj per ligo.
- *Ŝi ridis pri la du seĝoj, ĉe kiuj unu piedo estis malpli longa ol la tri aliaj, kaj ŝi komparis ilin **kun la kripluloj-maljunuloj**, kiujn ŝi vidadis sur la stratoj.* M.38 Ŝi metis ilin unu kun la alia en la pensoj por kompari ilin.

## Akompana eco, sento aŭ fenomeno

*Kun* povas montri ian econ, senton aŭ fenomenon, kiu akompanas ion (personon, objekton, agon):

- *"Kion mi vidas!" diris ŝia patrino **kun grandega miro**.* FE.17 Ŝiajn vortojn akompanis miro.
- ***Kun bruo** oni malfermis la pordegon.* FE.38 Samtempe kiel la malfermado, kaj pro ĝi, aŭdiĝis bruo.
- *Viaj konatoj estos homoj **kun la plej aristokrata konduto**.* Rz.84 *= ... homoj, kiuj kondutas plej aristokrate.*
- *Tio signifas? – demandis Marta **kun frapanta koro**.* M.30 Ŝia koro frapadis dum ŝi demandis.
- *Li deturnis la kapon kaj respondis **kun apenaŭ kaŝata malkontenteco**.* M.10
- *La infano **kun vizaĝo ruĝa de varmego** ĵetiĝadis sur ĝi* [= la litaĵo] ***kun preskaŭ senĉesa tusado kaj neklaraj plendoj**.* M.194 Aŭ *... dum preskaŭ senĉesa tusado ...*

## Tempo

*Kun*-esprimo povas montri ion, ĉe kies apero (aŭ tuj poste) okazas io:

- *Leviĝu **kun la suno**, edziĝu dum juna.* PE.896 *= Leviĝu, kiam la suno leviĝas ...*
- *Samtempe **kun la leviĝo de la ambaŭ virinoj** malaperis la paro da okuloj.* M.43 Oni povus ankaŭ uzi *kiel*: *Samtempe kiel la leviĝo ...*
- ***Kun tiuj ĉi vortoj** li malaperis en la arbaron.* Rt.59 *= Dirinte tiujn ĉi vortojn li malaperis ...*
- ***Kun la nuna numero** finiĝas la unua jaro de eldonado de nia gazeto.* OV.82 La unua jaro finiĝas, kiam eldoniĝas la nuna numero.

*Kun* povas ankaŭ montri tempon, dum kies iom-post-ioma iro io ŝanĝiĝas:

- *Ŝi amis lin **kun ĉiu tago** pli varmege kaj pli sincere.* FA1.172 La amo kreskis laŭ la pasado de la tagoj.
- ***Kun la tempo** la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan.* FAnt.48 *= Laŭ la paso de la tempo ...*

## *Kun* kvazaŭ participo

Ofte oni povus anstataŭigi *kun* per aktiva participo (§28.1). La frazparto post *kun* estus objekto de tiu participo:

- *Li renkontis vartistinon **kun malgranda infano**.* FA1.198 = *Li renkontis vartistinon havantan malgrandan infanon. ... vartistinon, kiu havis malgrandan infanon.*
- *Li **kun teatra gesto** montris la pordon de la kabineto.* M.46 = *... farante teatran geston ...*
- *La ĉefepiskopo forlasis ŝin **kun koleraj vortoj**.* FA1.176 = *... dirante kolerajn vortojn.*
- *Li sidis **kun** la brakoj kunmetitaj. = ... havante la brakojn kunmetitaj.* Ĉi tie *kun* peras priskribon (§25.1.2), kvazaŭ ĝi estus verbo.

## Koncernato

Zamenhof ofte uzis *kun* por montri ion, kio estas iel koncernata. Kiam ne temas pri akompano, estas rekomendinde uzi pli klaran rolvorteton. Ofte *pri* (§12.3.6.10) estas la ĝusta elekto:

- *Estis **kun li** tiel same, kiel **kun la ministro**: li rigardadis kaj rigardadis.* FA1.109 Uzu *pri*.
- ***Kun la kudrado de gantoj** la afero iris malbone.* FA1.221 Uzu *pri*.
- *Kiu povus supozi, ke sinjorino Herminio iam agos **kun vi** en tiel kruela maniero!* M.150 Uzu *kontraŭ*.
- *Kio fariĝis **kun ŝiaj infanoj**?* M.118 Uzu *al*.
- *Rekomendinte al la infano esti singarda **kun la fajro**, ŝi denove malsupreniris.* M.13 Uzu *pri*. = *... singarda en ĉiu ago, kiu koncernas la fajron ...* Iafoje tamen *singarda kun* povas esti tute bona: ***Kun li** oni devas esti singarda.* Rz.32 = *Kiam oni estas kun li ...*

## *Kun* kaj *per*

Iafoje *kun* kaj *per* (§12.3.6.7) povas esti tre proksimaj. Ilo aŭ rimedo ja ankaŭ akompanas la agon, al kiu ĝi servas. Oni elektu laŭ tiu senco, kiun oni volas esprimi:

- *Ĉe la lasta vorto li **kun teatra gesto** montris la pordon de la kabineto.* M.46 La montrado estis akompanata de teatra gesto, tial *kun*. Oni uzu anstataŭe *per*, se ĝuste la teatra gesto servis por montri la pordon.
- *Mi iris **kun ŝipo, kiu veturis norden**.* FA3.128 Li akompanis la ŝipon. Oni povus ankaŭ uzi *per*, se oni volas diri, ke li uzis la ŝipon kiel veturilon.

Sed plej ofte *kun* kaj *per* donas tute malsamajn signifojn: *Ŝi vidis ĉevalon **per binoklo*** (ŝi uzis la binoklon por vidi). *Ŝi vidis ĉevalon **kun binoklo*** (la ĉevalo havis binoklon, aŭ eble ŝi havis binoklon, sed ne uzis ĝin por vidi la ĉevalon).

### Rolvortaĵoj kun *kun*

Legu ankaŭ pri rolvortaĵoj kiel *kompare kun*, *kune kun* en §12.3.7.

### Vortfarado

- *Kune* = "samtempe + samloke + samage + samcele, kiel unu tuto, unu kun la alia": *Ĉu vi konsentas, ke ni vojaĝu **kune**?* FA1.64 *Patro kaj patrino **kune** estas nomataj gepatroj.* FE.36 *Ili estas **kune**.* (= *Ili havas amrilaton.*) *Kune kun* estas ofte uzata kiel pli emfaza formo ol simpla *kun*. Vidu ekzemplojn ĉi-antaŭe.
- *Ĉi-kune* = "kun tio ĉi, kune kun tiu ĉi letero, paketo aŭ simile": *Mi sendas **ĉi-kune** internacian respondkuponon.*
- *Kunigi* = "kaŭzi, ke io estu kun io": *Malfeliĉo ofte **kunigas** la homojn, kaj feliĉo ofte disigas ilin.* FE.42
- *Kuniĝi* = "ekesti kune kun io": *Eĉ en sonĝo ŝi ne povis **kuniĝi** kun ili.* FA3.123 *Ĉiuj tiuj larmoj **kuniĝis** en unu solan larmon.* FA3.142

En kunmetaĵoj prefikseca *kun* montras jen kunecon, jen kuniĝon. Neniu regulo decidas pri tio: *kunludi* = "ludi kune", *kuntreni* = "treni kun si", *kunmeti* = "meti en la saman lokon", *kuntiri* = "tiri al la sama loko, tiri kun si". Oni faris diversajn provojn distingi la du signifojn de prefikseca *kun*: *kunevivado*, *kunkunvoki*, *kunenveni*, *alkunveni* k.s. Ĉiuj provoj malsukcesis. La praktiko montris, ke distingaj formoj ne estas bezonataj. Por klare montri kunecon, la plej bona solvo estas dismeti la kunmetaĵon: *ludi kune*, *tiri kun si* k.s.

### 12.3.6.5. *Laŭ*

*Laŭ* montras vojon, irejon aŭ longforman aferon, kiun io sekvas en movo:

- *Nun mi kuros supren **laŭ la ŝtuparo**.* FA1.212 = *... sekvante la vojon de la ŝtuparo.*
- *Li veturigos nin **laŭ Rejno** supren.* Rn.15 La veturo sekvos Rejnon (rivero), ĉu en la akvo, ĉu sur la bordo.
- *Ni turnis nin kaj ekiris **laŭ la vojo al Baŝan**.* Re.3
- *Ĝi* [= la formiko] *rampis supren **laŭ la trunko**.* FA3.132
- *Ŝi deflankiĝis de la rekta linio, **laŭ kiu** ŝi kuris ĝis nun.* M.212
- *Senĉesa bruo de radoj simile al senfina tondro kuris **laŭ la mezo de la larĝa strato**.* M.200
- *La boato kuris **laŭ la fluo**.* FA2.56 La boato sekvis la direkton de la fluanta akvo. La fluanta akvo estis kiel vojo.
- *Iru **laŭ la vojo de la prudento**.* SS.9 Figura esprimo.

### Nevoja direkto

*Laŭ* povas montri ion nevojan, kies direkton io sekvas:

- *Katon oni devas karesi **laŭ la haroj**.* = *... laŭ la direkto de la haroj.*

- *Li kuŝiĝis **laŭ sia tuta longo** malantaŭ flartabakujo.* [FA1.154] Li devis sekvi sian propran longon, kiam li kuŝiĝis.

## Konformeco

Plej ofte *laŭ* montras ion, al kio io konformas. Povas esti volo, sento, opinio, signo, informo, klarigo, modelo, normo, plano, regulo k.t.p. (ofte la mala signifo estas esprimebla per *kontraŭ*):

- *Mi restas tie ĉi **laŭ la ordono de mia estro**.* [FE.26] Mi sekvas lian ordonon.
- *Se montriĝos, ke estas necese ion aldoni aŭ ŝanĝi, mi tion ĉi volonte faros **laŭ viaj konsiloj**.* [L2.149]
- *Tio ĉi estas **laŭ lia gusto**.* [PE.826] = *... konforma al lia gusto.*
- *Neniu el ili scias flugi **laŭ signo kaj komando**, aŭ danci **laŭ muziko de pafilegoj**.* [Rt.70]
- *Je la oka horo ŝi devis **laŭ la kutimo** iri al la kudrejo.* [M.133]
- *Mi rakontos ĉion **laŭ ordo**.* [Rz.13]
- *Mi mem, **laŭ via ekzemplo**, volas okupi min per literaturo.* [Rz.95]
- *Lerni la lingvon ĉiu povas **laŭ ĉiuj libroj, kiujn li deziros**.* [FK.xi]
- ***Laŭ la ruĝa mantelo kaj la ora kolĉeno** oni povis rekoni la larĝan magistratanon.* [Rn.21]
- *Mi preferis ne tuŝi tiujn duoblajn formojn, sed rigardi ambaŭ formojn kiel egale bonajn kaj uzeblajn **laŭ la libera elekto de la uzantoj**.* [LR.146A]

## Bazo de eldiro

Ofte oni uzas *laŭ* por montri bazon por tio, kion prezentas la tuta frazo:

- ***Laŭ la projekto de la inĝenieroj** tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj.* [FE.25] = *Se oni konsideras la projekton de la inĝenieroj ... Se pravas la projekto ...*
- *La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro **laŭ sia boneco kaj honesteco**, estis krom tio unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi.* [FE.11] = *... se oni konsideras ŝian bonecon kaj honestecon ...*
- *En la sama momento venis iom pli maljuna virino, ankaŭ malriĉa **laŭ siaj vestoj kaj aspekto**.* [FA3.74] = *... tion oni povis kompreni pro ŝiaj vestoj kaj aspekto.*
- *La maljuna avo **laŭ sia profesio** estis skulptisto.* [FA2.109] = *Se oni nomas lin laŭ la profesio ...*
- ***Laŭ mi** tiu ĉi demando estas por la publiko sen signifo.* [DL.10] = *Mi opinias, ke ... Miaopinie ...*
- *Tiu ĉi vido **laŭ ŝia opinio** estis la plej bela.* [FA1.84] = *Ŝia opinio estis, ke tiu ĉi vido estas la plej bela.*

Legu ankaŭ pri la uzo de *si* kaj *sia* en iaj *laŭ*-esprimoj en §11.6.2.

## Vortfarado

- *Laŭe* = “laŭ tio, konforme al tio”: *Ne forgesu agi **laŭe**.*

- *Laŭlonge* = “laŭ la longo de io”: *Li iris returne al la Orienta strato kaj* ***laŭlonge*** *trairis ĝin jam preskaŭ tutan, kiam eklumis la luno.* [FA1.118] (Li trairis la straton ne laŭ ĝia larĝo, sed laŭ ĝia longo.) *Li dancis* ***laŭlonge*** *de la tuta vojo.* [FA1.73]
- *Laŭdire* = “laŭ tio, kion oni diras”: ***Laŭdire*** *li forlasis sian edzinon.*
- *Laŭigi* = “adapti”: *La partio* ***laŭigis*** *sian politikon al la novaj cirkonstancoj.*

### 12.3.6.6. *Malgraŭ*

*Malgraŭ* montras ion, kio devus malhelpi, sed kio tamen ne sukcesas malebligi la aferon:

- *Ĉiuj sukcesoj de Esperanto venis de tio, ke ni ĉiam staris forte,* ***malgraŭ ĉiuj ventegoj***. [L2.92] Ĉiuj ventegoj ne sukcesis malebligi, ke ni staris forte.
- *Post mia forveturo li,* ***malgraŭ sia malbona farto***, *veturis ankaŭ Bruselon.* [OV.247] La malbona farto ne sukcesis malebligi la veturon al Bruselo.
- *Se mi ne scius, ke* ***malgraŭ via tuta ventanimeco*** *vi esence estas bona knabo, mi vere povus ekmalami vin.* [M.46] La ventanimeco ne estas sufiĉa kialo por nomi lin malbona knabo.
- *Miaj tieaj enspezoj* [...] *ne sufiĉis* ***malgraŭ mia tre modesta kaj tre avara maniero de vivado****!* [L1.113] Oni povus supozi, ke pro la modesta vivado la enspezoj sufiĉos, sed tiel ne estis.
- *Suferi mizeron mi devas, sed toleri ofendojn...* ***malgraŭ ĉio****... mi ne povas... ne, mi ankoraŭ ne povas! Adiaŭ!* [M.172] Eble mi devus toleri ankaŭ ofendojn, sed mi tamen ne povas tion fari. *Malgraŭ ĉio* ricevas sian signifon de la kunteksto, ekz. “malgraŭ ĉiuj supozoj”.

#### *Malgraŭ tio ke*

Oni povas uzi *malgraŭ* ankaŭ antaŭ *ke*-frazo (§33.2.3), sed normale oni intermetas helpan *tio*:

- *Li forveturis* ***malgraŭ tio, ke mi malpermesis tion***. Tio, ke mi malpermesis forveturadon, ne povis malhelpi, ke li forveturis.

*Malgraŭ (tio) ke* tre similas al *kvankam* (§33.7).

### 12.3.6.7. *Per*

Baze *per* montras ilon aŭ rimedon por fari agon, por atingi rezulton:

- ***Per hakilo*** *ni hakas,* ***per segilo*** *ni segas,* ***per fosilo*** *ni fosas,* ***per kudrilo*** *ni kudras,* ***per tondilo*** *ni tondas,* ***per sonorilo*** *ni sonoras,* ***per fajfilo*** *ni fajfas.* [FE.45] La montritaj aferoj estas iloj por la respektivaj agoj.
- *Ŝi kombas al si la harojn* ***per arĝenta kombilo***. [FE.34]
- *En somero ni veturas* ***per diversaj veturiloj****, kaj en vintro ni veturas* ***per glitveturilo***. [FE.34]
- *Li pagis la rizon* ***per sia lasta mono***.

Korpoparto povas servi kiel ilo:

- *Ni vidas* ***per la okuloj*** *kaj aŭdas* ***per la oreloj****.* FE.9
- *Li faris ĉion* ***per la dek fingroj de siaj manoj****.* FE.12
- *Nun la juvelisto jam* ***per ambaŭ manplatoj*** *ekfrotis siajn harojn.* M.190
- ***Per la haroj*** *mi vin trenos en la preĝejon.* Rt.77 Ĉi tie temas pri korpoparto, kiun la aganto tenos. En tiaj okazoj oni prefere uzu *je* (§12.3.1).

Eĉ persono povas esti uzata kiel ilo:

- *Ni* ***per niaj spionoj*** *eksciis, ke Roller estas bone enpeklita.* Rt.62 Oni uzis la spionojn por eltrovi aferon.
- *Kion la alte estimata magistrato anoncigas al mi* ***per vi****?* Rt.69 La magistrato donis al vi la taskon anonci ion al mi.

Iafoje loko povas esti rigardata kiel rimedo por io:

- *Enirinte* ***per la pordo*** *de la kuirejo, mi enrigardis tra la pordokurteno.* M.46 Normale oni uzus *tra*, sed *per* ne estas erara.

Ankaŭ ago aŭ kondutmaniero povas esti rimedo por atingi ion:

- *Li konsilis al vi, ke vi vendu* ***per aŭkcio*** *vian dokumenton de nobeleco.* Rt.40 Aŭkcio servu kiel rimedo por vendi ion.
- *Vortoj kunmetitaj estas kreataj* ***per simpla kunligado de vortoj****.* FE.27
- *Mi ne scias la lingvon hispanan, sed* ***per helpo de vortaro hispana-germana*** *mi tamen komprenis iom vian leteron.* FE.34 *Per helpo de* estas praktike egala al simpla *per*.
- *Vian liton virgulinan mi okupos* ***per forto****, kaj vian fieran ĉastecon mi venkos* ***per ankoraŭ pli granda fiereco****.* Rt.77 Mi uzos forton kaj fierecon por atingi celon.
- *Ĉiu povis ĝin rekoni tuj* ***per la unua rigardo****.* FA1.221
- *Mi rekonis lin* ***per la voĉo****.* Mi rekonis lian voĉon, kaj tiel povis rekoni lin. Rimarku la diferencon disde la antaŭa ekzemplo, kie la *per*-komplemento estas ago de la rekonanto. Ĉi tie la *per*-komplemento estas "ago" de la rekonato (lia parolado). Povas esti pli bone uzi *laŭ* en tiaj okazoj: *Laŭ lia sufokiĝanta voĉo oni apenaŭ povus rekoni en li sinjoron Snitchey.* BV.84

## Nepersona aganto aŭ kaŭzanto

*Per* povas montri nepersonan aganton aŭ kaŭzanton. La sama afero ankaŭ povas aperi kiel subjekto:

- *La juna virino efektive tremis* ***per la tuta korpo****.* M.12 Oni povus ankaŭ diri: *Ŝia tuta korpo tremis.*
- *Ĉu* [...] *ĝi* [= la historio] *flamigis vian infanan fantazion kaj infektis vin* ***per la manio fariĝi granda homo****?* Rt.85 ≈ *Ĉu la manio fariĝi granda homo infektis vin?*
- *La sango elfluis* ***per grandaj gutoj****.* FA3.2 Grandaj sangogutoj elfluis.

- *La pli maljuna estis tiel simila al la patrino* ***per sia karaktero kaj vizaĝo****, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon.* [FE.11] Ŝia karaktero kaj vizaĝo estas similaj al la karaktero kaj vizaĝo de la patrino. Ŝia karaktero kaj vizaĝo estis la kaŭzo de la simileco.
- *La vintra ĉielo brilis* ***per la plej pura lazuro****.* [M.116] Plej pura lazuro brilis. La lazuro estis la kaŭzo de la brilo.

Ĉe iaj IĜ-verboj nepersona aganto aŭ kaŭzanto povas aperi kiel *per*-komplemento. Se oni forigas IĜ, la *per*-komplemento povas fariĝi subjekto:

- *La remparo fortikiĝis kaj baldaŭ kovriĝis* ***per abunda herbo****.* [FA2.116] Abunda herbo kovris la remparon.
- *Li vekiĝis* ***per tio, ke iu lin skuis****.* [FA1.217] Tio, ke iu lin skuis, vekis lin. La skuado vekis lin.
- *Ŝi ne havis piedojn, la korpo finiĝis* ***per fiŝa vosto****.* [FA1.82] Fiŝa vosto finis la korpon. Oni povus eble uzi *je* anstataŭ *per*, sed *per* estas pli bona.

### Ago

Iafoje *per*-komplemento ripetas la agon de la ĉefverbo kun aldonaj informoj:

- *Mia onklo ne mortis* ***per natura morto****.* [FE.39] = *Mia onklo ne mortis nature.*
- *Ŝi ankaŭ flugis rekte en la fornon, al la stana soldato, ekflamis* ***per hela flamo*** *kaj malaperis.* [FA1.158] = *... ekflamis hele ...*
- *Ŝi sidiĝis sur la planko apud la patrino, kuŝiĝis sur ŝiaj genuoj kaj ekdormis* ***per dormo malfacila kaj longa****.* [M.182] = *... ekdormis malfacile kaj longe.*

Ĉe iuj verboj oni simile uzas objekton, kiu ripetas la agon de la ĉefverbo (§30.2).

### *Per si (mem)*

La esprimo *per si (mem)* (§11.6.3) signifas "per propra efiko, sen ia rimedo":

- *La rideto nun elnaĝis* ***per si mem*** *kaj sen perforteco el la brusto de la juna patrino.* [M.71]
- *Ĉiuj prepozicioj* [= rolvortetoj] ***per si mem*** *postulas ĉiam nur la nominativon* [= formon sen N-finaĵo]. [FE.28]
- *Esperanto estas plena je harmonio kaj estetiko kaj memorigas* ***per si*** *la lingvon italan.* [FK.284]

### Mezuro

*Per* estas iafoje uzata por montri mezuron:

- *Ĉiu sciigo, ho ve, alproksimigas min* ***per unu paŝo*** *al la tombo!* [Rt.6]
- *Kiam ekparolas kun mi persono, kiu havas rangon* ***per unu grado*** *pli altan, mia animo tuj forkuras kaj mia lango engluiĝas en koton.* [Rz.56]

Sed normale oni uzas N-finaĵon (§12.2.3) aŭ *je* (§12.3.1) por montri mezuron.

### Potenco alvokata

Oni uzas *per* ĉe alvokoj de ia potenco en ekkrioj, ĵuroj kaj similaj esprimoj. *Per* tiam montras rimedon por iel akiri fortojn aŭ simile:

- ***Per Dio**! Mi ne povus tion kredi, se mi ne vidus ĝin per miaj propraj okuloj.* H.5
- ***Per ĉiuj diabloj**! mi elgratos al li per la ungoj la okulojn.* Rt.40
- *Mi ĵuras **per mia honoro**.* Rt.13

Oni tiel uzas ankaŭ *pro* (§12.3.6.11) kaj iafoje *je* (§12.3.1). Oni ankaŭ uzas similajn ekkriojn tute sen rolmontrilo. Oni povus diri, ke tiam temas pri la frazrolo alvoko (§12.1.2).

### *Per* kaj *de*

En pasivaj frazoj (§29) oni povas iafoje heziti, ĉu uzi *per* aŭ *de* (§12.3.2.4). Tiaj hezitoj ekestas ĉe verboj, kiuj povas havi aŭ aganton aŭ ilon kiel subjekton. Oni povas diri ekz. *la botelo estis ŝtopita **per korko***, se oni pensas: *Iu ŝtopis ĝin per korko.* Sed oni ankaŭ povas diri: *la botelo estis ŝtopita **de korko***, se oni pensas: *Korko ŝtopis la botelon.* Aliaj tiaj verboj estas ekz. *kovri* (§30.7), *bari*, *garni*, *ilustri*, *komenci*, *trafi*, *vundi* kaj *legitimi*.

### Vortfarado

- *Pera* = “nerekta, uzanta interan rimedon”: *Mi instruas Esperanton laŭ **pera** metodo.* (= *laŭ nerekta metodo [kiu uzas nacian lingvon]*).
- *Pere* = “nerekte, uzante interan rimedon”: *Ni interparolis **pere** de interpretisto.* Vidu pli da ekzemploj en la klarigoj pri la rolvortaĵo *pere de* (§12.3.7).
- *Senpere* = “rekte, sen interaĵo, tuj (en loka signifo)”: *Knut staris **senpere** ĉe la pordeto de la kaleŝo.* FA3.65 *Mi eksciis tion **senpere**.* (= *... rekte de la fonto.*)
- *Peri* = “interhelpi, havigi ion interhelpe”: *Ni povas **peri** abonojn de ĉiaj Esperantaj gazetoj. / Mi estas **peranto** de UEA.*
- *Pero* = “la ago peri ion, perado”: *Nenia voĉdonado de la L.K-anoj povas esti farata sen la **pero** de la prezidanto.* OV.565 (L.K. = la Lingva Komitato.)

Ĉiuj tiuj *per*-vortoj enhavas komunan bazan agosignifon, kiu estas simila, sed ne identa al la signifo de la rolvorteto *per*. Tial iuj preferas diri, ke temas pri aparta aga radiko.

- *Perlabori* = “akiri per laboro”: *Mi **perlaboras** du mil eŭrojn en monato. / Duoblan pagon de dungito li **perlaboris** ĉe vi dum ses jaroj.* Re.15 La vorto *perlabori* estas ekzemplo de vortigo de frazeto per verba finaĵo (§37.4). Simile: *perflati* = “akiri per flatado”, *perludi*, *perŝviti* k.a.

### 12.3.6.8. *Po*

*Po* montras porcion de io, kio estas iel distribuata al pluraj personoj, al pluraj aĵoj, al pluraj lokoj aŭ simile. Al ĉiu el la diversaj aferoj apartenas unu porcio. Por ekscii la tutan kvanton, la tutan nombron, oni devas multipliki la *po*-kvanton per ia nombro. Kiu estas tiu nombro, dependas de la kunteksto.

*Po* estas tradicie klasita kiel rolvorteto, kio signifas, ke oni ne uzas N-finaĵon ĉe vorto post *po*. Sed multaj uzas ĝin kiel E-vortecan vorteton, kaj tiam oni ja povas uzi N-finaĵon, kiam la frazo tion postulas. Ambaŭ uzoj estas ĝustaj. La gramatika karaktero de *po*, kaj la demando, ĉu povas aperi N-finaĵo post *po*, estas traktataj en la klarigoj pri nuanciloj de nombraj kaj kvantaj vortoj (§23.6). Ĉi tie temas nur pri la signifo de *po*, kaj pri ĝia loko en frazo.

*Po* havas sencon nur rilate al ia nombro aŭ kvanto. Post *po* do ĉiam devas stari nombrovorto aŭ alia kvanta esprimo: *po kvin*, *po dek*, *po dudek mil*, *po multe*, *po kiom*, *po miliono*, *po duono*, *po iom*, *po pluraj*, *po paro*, *po egalaj partoj* k.s. Iafoje oni subkomprenas la kvanton: *po pomo = po unu pomo*, *po tutaj boteloj = po pluraj tutaj boteloj*.

- *Por miaj kvar infanoj mi aĉetis dek du pomojn, kaj al ĉiu el la infanoj mi donis* ***po tri*** *pomoj.* FE.14 3 pomoj oble 4 = 12 pomoj. Rimarku, ke la rezulto montras **pomojn**, ne infanojn. Oni multiplikis 3 pomojn per la nombro de la infanoj, sed la rezulto estas nepre 12 pomoj, ne 12 infanoj. La rezulto de ĉi tia kalkulo rilatas ĉiam al tio, kion montras la *po*-esprimo.
- *Tie estis viro tre altkreska, kiu havis sur la manoj kaj sur la piedoj* ***po ses*** *fingroj, sume dudek kvar.* Sm2.21 6 fingroj oble 4 (2 manoj + 2 piedoj) = 24 fingroj.
- *Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial, se mi legos en ĉiu tago* ***po dek kvin*** *paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj.* FE.14 15 paĝoj oble 4 = 60 paĝoj.
- *Grandaj grupoj aŭ societoj povas elekti* ***po unu*** *delegito por ĉiuj 25 membroj.* L2.265 Ĉi tiu ekzemplo estas pli malsimpla. La *po*-esprimo devas esti multiplikita per la nombro de dudekkvinoj da membroj. Se grupo havas 75 membrojn, ĝi havas 3 dudekkvinojn da membroj. 1 delegito oble 3 = 3 delegitoj.
- *Ŝi ricevis iel du lecionojn* ***po dudek*** *spesdekoj por horo.* M.102 Ĉi tie gravas la suma nombro de horoj. Se la du lecionoj daŭris sume ekz. 4 horojn, la kosto estis: 20 spesdekoj oble 4 = 80 spesdekoj. (Speso estas fikcia monunuo.)
- *Dume la gastoj trinkis* ***po*** *glaseto da vino.* Gm.62 Ĉi tie estas subkomprenata la vorto *unu*: ... ***po unu*** *glaseto* ... Se estis ekz. 10 gastoj, estis sume ankaŭ 10 glasetoj.
- *La svatiĝantoj, laŭ la ordo de sia alveno, estis numerataj kaj starigataj en vicoj,* ***po ses*** *en unu vico.* FA3.97 Se estis ekz. 20 vicoj, estis 6 svatiĝantoj oble 20 = 120 svatiĝantoj.

- *Mi kudrados **po dek** horoj ĉiutage por dudek spesdekoj.* [M.109] Se mi kudrados ekz. 7 tagojn, mi kudrados: 10 horojn oble 7 = 70 horojn. (Cetere ĉiu tago donas salajron de 20 spesdekoj.)
- *Dividu la prenitaĵon **po duono** inter tiuj, kiuj partoprenis en la milito kaj iris batali, kaj inter la tuta komunumo.* [Nm.31] Iom aparta ekzemplo. La partoprenintoj ricevu unu duonon de la prenitaĵo. La tuta komunumo ricevu unu duonon. Estis do 2 grupoj da ricevantoj. 1 duono oble 2 = 2 duonoj (la tuto de la prenitaĵo).
- *El ĉiuj vivaĵoj, el ĉiu karno, enkonduku **po unu paro** el ĉiuj en la arkeon, ke ili restu vivaj kun vi* [...] ***po paro*** *el ĉiuj eniru kun vi, por resti vivaj.* [Gn.6] Se estus ekz. 1000 bestospecoj, estus 2 bestoj (1 paro) oble 1000 = 2000 bestoj (1000 paroj).
- *La urbestro aranĝas grandajn tagmanĝojn, kie la vino estas trinkata **po tutaj boteloj**.* [FA3.74] = *... po pluraj tutaj boteloj*. En ĉiu tagmanĝo oni trinkas plurajn tutajn botelojn. Oni ne povas fari kalkulon, ĉar oni ne scias, kiom da tagmanĝoj estas, kaj oni ne scias precize, kiom da tutaj boteloj estas trinkataj.

### Erara uzo de *po*

Ne metu *po* antaŭ la malĝusta esprimo. Jen erara ekzemplo: **Tiu ĉi ŝtofo kostas dek dolarojn **po** metro.** La sumo, kiu ripetiĝas, estas 10 dolaroj. Sekve la ĝusta loko de *po* estas antaŭ tiu sumo: *Tiu ĉi ŝtofo kostas **po dek dolarojn** por metro.* Se estas ekz. 5 metroj, la kalkulo fariĝas: 10 dolaroj oble 5 = 50 dolaroj.

Multaj lingvoj uzas en ĉi tiaj frazoj nur unu vorton por esprimi distribuon. Tiu vorto staras antaŭ *metro*. Oni konfuzas *po* kun tiaj vortoj, kiuj havas tute alian signifon ol *po*. En Esperanto oni esprimas tiajn ĉi aferojn per du vortoj, *po* kaj unu alia. La alia vorto estas ofte *por*, sed depende de la kunteksto ankaŭ aliaj rolvortetoj (aŭ E-formo) povas esti uzataj. En la ĉi-antaŭa ekzemplo ekz. *laŭ metro* aŭ *metre* estas eblaj. Vidu ankaŭ la klarigojn pri frakcistrekoj (§23.7).

Notu ankaŭ la diferencon inter la jenaj du frazoj, kiuj estas ambaŭ ĝustaj, sed havas tute malsamajn signifojn:

- *La aŭto veturis **po dek** kilometrojn en kvin horoj.* La aŭto veturis sume 5 horojn, kaj ĝi veturis sume 50 kilometrojn. (10 kilometroj oble 5 = 50 kilometroj.)
- *La aŭto veturis dek kilometrojn en **po kvin** horoj.* La aŭto veturis sume 10 kilometrojn, kaj tio daŭris sume 50 horojn. (5 horoj oble 10 = 50 horoj.)

Por eviti erarojn oni memoru, ke *po* ĉiam staru antaŭ nombrovorto aŭ alia kvanta esprimo.

### *Ĉiu* anstataŭ *po*

Ofte la vorteto *ĉiu* (§15.1) povas sola montri distribuan sencon: ***Ĉiu** banano kostas (**po**) unu speson. **Ĉiu** el ili ricevis (**po**) cent eŭrojn.* Kun *po* tiaj ĉi frazoj tamen fariĝas pli klaraj.

## 12.3.6.9. *Por*

*Por* montras intencatan celon, sed havas plurajn kromajn uzojn.

Ankaŭ *al* (§12.3.5.1) montras celon, sed *por* pli montras, ke la celo estas ies intenco (kiu eble ne efektiviĝas). Ĉe *al* temas normale pri efektiva celo. Legu ankaŭ pri la diferenco inter *por* kaj *pro* en §12.3.6.11.

### Celata ago, celata uzo...

*Por* povas montri celatan agon, staton, uzon, uzolokon k.s.:

- *En unu el la neĝaj domoj du homoj jam kuŝiĝis **por ripozo**.* [FA3.83] La celo de kuŝiĝo estis ripozo.
- *Lignon **por hejtado** vi trovos malantaŭ la forno.* [M.8] La uzocelo de la ligno estas hejtado.
- *Ŝi estas tuj preta **por ĉiuj komplezoj**.* [Rz.93]
- *Mi estas kolera, kaj mi havas sufiĉan kaŭzon **por tio**.* [FA3.26]
- *Mi ne havas tempon **por tio**.* [M.76]
- *Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas **por vino**.* [FE.32]
- *Oni metis antaŭ mi manĝilaron, kiu konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto **por brando**, glaso **por vino** kaj telertuketo.* [FE.34]
- *Vipo estas **por ĉevalo**, brido **por azeno**, kaj bastono **por la dorso de malsaĝuloj**.* [SS.26]
- *Iru do jam fine, mi devas vesti min **por la teatro**.* [M.165] = *... surmeti vestojn, kiuj konvenas en la teatro.*
- *Tie staris ĉiaj laboriloj necesaj **por tanejo**.* [FA3.43]
- *Antaŭ tagiĝo li leviĝis, kisis nin ĉiujn **por adiaŭ** kaj forveturis.* [FA1.236]
- *Mi donos al vi kaj al via idaro post vi la landon* [...] ***por eterna posedaĵo**.* [Gn.17] La celo estas, ke la lando estu eterna posedaĵo. Pli ofte oni uzas komparan *kiel*-esprimon (§20.1) en ĉi tiaj frazoj: *... kiel eternan posedaĵon.*

### Celata uzanto, profitanto...

*Por* povas montri celatan uzanton, posedanton, ricevanton, profitanton, kontentiĝanton, ĝuanton k.s.:

- ***Por miaj kvar infanoj** mi aĉetis dek du pomojn, kaj al ĉiu el la infanoj mi donis po tri pomoj.* [FE.14] Mi aĉetis la pomojn kun la celo, ke la infanoj ricevu ilin. Ĉi tie oni klare vidas la diferencon inter *por* kaj *al*. *Por* montras la intencon. *Al* montras la efektivan transdonon.

- *Tiuj bonaj homoj certe trovos* ***por mi*** *laboron.* [M.65] *= ... laboron, kiun mi ricevu.*
- *Tuj ordigu bone tiun ĉambron* ***por la gasto****.* [Rz.40] La gasto uzos la ĉambron.
- *Mi iros* ***por vi*** *ĝis la fino de la mondo.* [FA3.3] *= ... por via profito ...*
- *La naturo, kiu longan tempon batalis kontraŭ ni, batalas nun* ***por ni****.* [OV.376]
- *Tiu ŝtono* [...] *kuŝas ankoraŭ sur la korto kiel ludloko* ***por la infanoj****.* [FA3.23]

## Celata tempo

*Por* povas montri celatan tempon, en kiu io okazu, aŭ dum kiu daŭru laŭplane ia ago, aŭ dum kiu daŭru la rezulto de ago:

- *Ĉiuj sopiroj de la koro celis nur loĝejon* ***por la nokto****.* [FA1.143] La loĝejon oni uzu dum la nokto.
- ***Por ĉiu horo de la tago*** *li havis apartan surtuton.* [FA1.107] Ĉiu surtuto estas celita por uzo en aparta horo.
- *Ŝi silentiĝis* ***por momento****, kvazaŭ ŝi bezonus denove kolekti siajn fortojn.* [M.57] Ŝia celo estis resti silenta nur momenton.
- *Kuzino Marinjo! mi petas vin ĉi tien* ***por unu minuto****.* [M.44]
- *Li forveturis* ***por unu tago*** *pro tre grava afero.* [Rz.90]
- *Tie troviĝu almenaŭ nova freŝa funebra krepo, kiam la maljunulo fermos* ***por ĉiam*** *siajn okulojn.* [FA3.146]

Ne konfuzu tempan *por* kun *dum* (§12.3.6.2). *Dum* simple montras tempodaŭron. *Por* montras celatan tempon: *Mi petas vin ĉi tien dum unu minuto.* La peto daŭras unu minuton. *Mi petas vin ĉi tien por unu minuto.* La peto celas, ke la alparolato venu por resti dum unu minuto.

Ne uzu *por* en esprimoj kiel **Por la unua fojo li vizitis min**, ĉar ne temas pri celata tempodaŭro. Uzu *je* aŭ N-finaĵon: *Je la unua fojo (la unuan fojon) li vizitis min.*

## Pozitiva opinio

*Por* povas montri ion, kion oni favoras, pri kio oni havas pozitivan opinion:

- *Aperas artikoloj plenaj de aprobo* ***por la ideo mem*** *kaj* ***por ĝiaj batalantoj****.* [FK.257]
- *Se la plimulto da esperantistoj voĉos* ***por la unua punkto****, tiam ni tute ĉesos paroladi pli pri reformoj.* [OV.186]
- *Ili forĵetu sian indiferentecon kaj alsendu al ni kiel eble plej frue sian voĉon* ***por*** *aŭ kontraŭ* ***la propono****.* [OV.189]

### Vidpunkto

*Por* povas montri tiun, el kies subjektiva vidpunkto oni taksas aferon:

- *Nia regimentestro estas* ***por siaj soldatoj*** *kiel bona patro.* [FE.37] El la vidpunkto de la soldatoj li estas kiel patro.
- *Tiu ĉi grava tago restos* ***por mi*** *ĉiam memorinda.* [FE.41]
- ***Por patrino*** *ne ekzistas infano malbela.* [PE.357]
- ***Por knabinoj*** *tio ne estis irebla vojo, ili disŝirus al si la vestojn.* [FA2.88]
- *Mi povas nur partopreni en parolado pri tiaj aferoj, kiuj estas kompreneblaj* ***por ĉiuj****.* [FA1.120]

Komparu kun *al*, kiu povas montri tiun, kiu efektive sentas aŭ spertas ion (§12.3.5.1). *Por* estas pli subjektiva, *al* pli objektiva.

### Bazo de taksado

*Por* povas montri tion, kion oni konsideras, kiam oni pritaksas aferon, aŭ tion, rilate al kio validas io bona aŭ malbona, k.s.:

- *Ili ne forgesu, ke tio ĉi estus danĝera* ***por la afero mem****.* [DL.12]
- *Kun danĝero* ***por nia vivo*** *ni akiras nian panon.* [Pk.5]
- *Ĝi havis verdan koloron, kio estis agrabla* ***por la okuloj****.* [FA3.129]
- ***Por sia aĝo*** *ŝi estas ankoraŭ sufiĉe juna.* [Rn.31]
- *Mi neniam havis talenton* ***por muziko****.* [M.28]

### Varo aŭ servo pagata

Ĉe esprimo de pago *por* povas montri komercaĵon k.s., kiun oni aĉetas, akiras, luas k.s.:

- *Neniu donos eĉ tiom, kiom oni devas pagi* ***por fasko da ligno****.* [M.197] Se oni volas aĉeti aŭ akiri faskon da ligno, oni devas pagi.
- *Mi ne donos al vi manĝi, ĝis vi pagos* ***por la antaŭa****.* [Rz.22] *= ... por la antaŭa manĝo.*
- *Al tiuj niaj abonantoj, kiuj pagis* ***por unu jaro****, ni permesas al ni memorigi, ke ilia tempo de abonado finiĝis.* [OV.82] Komparu kun tempa *por*.
- *Post du tagoj estos la fikstempo, en kiu mi devas enporti la luan pagon* ***por la loĝejo kaj la mebloj****.* [M.63]
- ***Por la hodiaŭa tago*** *mi ricevis duoblan pagon.* [FE.14] *= Por tiu laboro, kiun mi faris hodiaŭ, oni pagis al mi duoble.*

Ĉe pago Zamenhof iafoje uzis *pro* (§12.3.6.11).

Oni povas "pagi" aŭ rekompenci ne nur per mono, sed ankaŭ per danko aŭ eĉ maldanko aŭ puno:

- *Mi dankis lin* ***por la tuja plenumo de mia deziro****.* [FE.31] La plenumo estas kiel servo aŭ komercaĵo. La danko estas kvazaŭ pago por tio.
- *Mi dankas vin* ***por la prunto.*** [FE.14]

- *Ŝajnas al mi, ke li eĉ ĵetis vin malsupren de la ŝtuparo.* – ***Por tio** mi enĵetos lin en la inferon.* [Rt.39]
- *Ŝia fratino en ĉio estas kulpa; mi pagos al ŝi **por tio ĉi**!* [FE.21] *Pagi al ŝi* ĉi tie signifas *puni ŝin*. La frazo estas ironia.

*Danki por io* estis malprave kritikata. Ĝi estas tute bona esprimo, ĉar la simileco al pagado estas klara. Sed oni povas ankaŭ uzi la esprimon *danki pro io*, kiu nuntempe estas tre ofta (§12.3.6.11). Ambaŭ dirmanieroj estas same logikaj.

## Mono pagata aŭ ricevata

*Por* povas ankaŭ montri monon, prezon k.s., kiun oni pagas aŭ ricevas por aĉetaĵo, vendaĵo aŭ laboro:

- *La juna vidvino **por la iom da spesdekoj*** [...] *aĉetis iom da butero.* [M.64]
- *Mi kudrados po dek horoj ĉiutage **por dudek spesdekoj**.* [M.109]
- *Mi* [...] *disvendis ĉion **por plej bagatelaj prezoj**.* [Gm.66]

Sufiĉe ofte oni uzas anstataŭe *pro* (§12.3.6.11). Oni povas ankaŭ uzi *kontraŭ* (§12.3.4.8) kaj iafoje *per* (§12.3.6.7).

Se ĉi tia mona komplemento havas antaŭ si la vorteton *po* (§12.3.6.8), oni normale forlasas *por* (§23.6): *Ŝi ricevis iel du lecionojn po dudek spesdekoj por horo.* [M.102] *= ... du lecionojn **por po dudek spesdekoj** por horo.*

*Por* estas do uzata egale pri komercaĵo, kiun oni pagas, kaj pri mono, kiun oni donas por aĉeti komercaĵon, kaj pri mono, kiun oni ricevas pro vendo de komercaĵo. *Por* estas ĝenerala rolvorteto por tiaj frazroloj.

## Kalkulbazo

*Por* povas montri kalkulbazon ĉe disdonado, distribuo k.s.:

- ***Por ĉiu tago** mi ricevas kvin frankojn.* [FE.14] Oni obligas kvin frankojn per la nombro de tagoj. La nombro de tagoj decidas la salajron.
- ***Por ĉiu aĉetita funto da teo** tiu ĉi komercisto aldonas senpage funton da sukero.* [FE.31] Se oni aĉetis tri funtojn da teo, oni ricevas tri funtojn da sukero.
- *Grupoj aŭ societoj povas elekti po unu delegito **por ĉiuj 25 membroj**.* [L2.265] La nombro de 25-oj da membroj decidas la nombron de delegitoj.
- *Tio signifas, ke vi ricevus 100, 120, maksimume 150 spesmilojn **por jaro**.* [M.30]

Tiu ĉi zamenhofa uzo klare montras, ke *por* estas la baza vorto por legi frakcistrekojn (§23.7): *50 km/h = kvindek kilometroj **por** horo*. Sed iafoje aliaj alternativoj povas esti pli klaraj.

## Erara identeco

*Por* povas montri eraran identecon k.s., sed preskaŭ nur ĉe *preni*, kiu kune kun *por* povas havi la signifon "erari pri identeco":

- *Unu fojon oni eĉ prenis min **por ĉefa militestro**.* [Rz.46]

- *Tio, kion oni prenis **por natura leĝo de ĉiuj lingvoj**, estas nur okaza apartenaĵo de kelkaj lingvoj.* [LR.72A]
- *Vi akceptas **por kontanta mono** la vortojn, kiuj vere ne enhavas eĉ plej malgrandan indon.* [H.26] Normale: *... kiel kontantan monon ...*

### Antaŭ *ke*-frazo

Oni ofte uzas *por* antaŭ *ke*-frazo (§33.2.3):

- *Kaj ŝi tuj lavis sian kruĉon kaj ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto kaj alportis al la virino, ĉiam subtenante la kruĉon, **por ke la virino povu trinki pli oportune**.* [FE.15]
- *Jen prenu ankoraŭ du panojn kaj unu ŝinkon, **por ke vi ne bezonu malsati**!* [FA2.70]

Oni povus intermeti helpan *tio*, kiel oni faras ĉe aliaj rolvortetoj antaŭ *ke*-frazo, sed tio preskaŭ neniam okazas ĉe *por*. Anstataŭe oni iafoje eĉ uzas simplan *ke* anstataŭ *por (tio), ke* (§33.2.3).

Preskaŭ ĉiam oni uzas U-verbon post *por ke* (§33.2.7).

### Antaŭ I-verbo

Ofte oni metas *por* antaŭ I-verbo (§27.5): *Unu fajrero estas sufiĉa, **por eksplodigi pulvon**.* [FE.41]

## 12.3.6.10. *Pri*

*Pri* montras temon, tion, kion ago traktas aŭ koncernas, k.s.:

- *Mi parolas **pri leono**.* [FE.7] La temo de la parolado estas leono.
- *Kiel ofte mi pensis **pri vi** kaj **pri la malnova tempo**!* [FA3.91] La pensoj havis vin kaj la malnovan tempon kiel temojn.
- *Mi ne kuraĝis demandi vin **pri tio**, ĉar mi vidis, ke vi penas eviti miajn demandojn.* [M.156]
- *Mia Dio! mi aŭdis **pri la malfeliĉo, kiu vin trafis**.* [M.95]
- *Mi instruas mian infanon **pri Esperanto**.* [LR.120A] (= *Mi instruas Esperanton al mia infano.* [LR.120A]) La temo de la instruado estas Esperanto.
- *Mi estas preta* [...] *vendi al vi tiun ĉashundon, **pri kiu** vi marĉandis. – Ne, ne **pri hundoj** mi nun pensas. – Nu, se vi ne volas, ni interkonsentos **pri alia hundo**.* [Rz.89]
- *Ili estis forte lacaj, **pri kio** certe neniu miros.* [FA2.107]
- *Ĉu vi ploras **pri mi**?* [FA1.194]
- ***Pri kio** estas la afero?* [PE.846] = ***Pri kio** temas? = Kion koncernas la afero? Al kio rilatas la afero? Kio estas la temo de la afero?*
- *Ĝenerale **pri la aferoj, kiuj koncernas la magazenon**, okupas sin mia edzo.* [M.84] La edzo okupas sin koncerne tiajn aferojn.
- *Mi zorgas **pri ŝi** tiel, kiel mi zorgas **pri mi mem**; sed ŝi mem tute ne zorgas **pri si** kaj tute sin ne gardas.* [FE.18]

- *Mi scias la pentradon tiom, ke mi povus doni instruon* ***pri ĝiaj plej elementaj reguloj****.* [M.33]
- *La scienculoj verkis librojn* ***pri la urbo****,* ***pri la palaco*** *kaj* ***pri la ĝardeno****, sed la najtingalon ili ne forgesis, al ĝi estis dediĉita la ĉefa ĉapitro.* [FA2.24]
- *Ŝi nun opiniis, ke la homoj estas kulpaj* ***pri ŝia senlima mizero****.* [M.201]

Kiam *pri* estas uzata prefiksece en verboj, ĝi ofte havas tute specialan efikon (§30.10).

### Vortfarado

- *Pria* = "temanta pri la koncerna afero": *Ŝi prelegis pri la klimatoŝanĝiĝo, kaj poste okazis* ***pria*** *diskutado.* (= ... *okazis diskutado pri tiu temo*).
- *Prie* = "pri la koncerna afero": *Ni interparolis* ***prie****.* (= *Ni interparolis pri tiu temo*).

La vortoj *pria* kaj *prie* estas netradiciaj, sed fariĝis relative popularaj en la pasintaj jardekoj.

## 12.3.6.11. *Pro*

### Kaŭzo

Plej ofte *pro* montras kaŭzon:

- *Ŝiaj dentoj frapadis* ***pro malvarmo****.* [FA1.45] La malvarmo kaŭzis la frapadon.
- *En la mezo de la nokto la koboldo vekiĝis* ***pro terura bruo ĉe la fenestraj kovriloj****.* [FA3.53] La bruo vekis lin.
- *Ĉu vi iam vidis vere malnovmodan ŝrankon, tute nigran* ***pro maljuneco*** [...]*?* [FA2.104] La maljuneco kaŭzis la nigran koloron.
- *Clemency el surprizo* ***pro tiu ĉi demando*** *preskaŭ renversis la pleton de teo.* [BV.83] La demando kaŭzis la surprizon, kiu siavice kaŭzis la renversadon. (*El* estas uzata por ne ripeti *pro* dufoje.)

Iafoje oni uzas por montri kaŭzon anstataŭe *de* (§12.3.2.1) aŭ *el* (§12.3.5.2).

### Motivo

*Pro* povas ankaŭ montri motivon aŭ kialon:

- *Mi ridas* ***pro lia naiveco****.* [FE.29] Mia kialo por ridi estas lia naiveco.
- *Li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola kaj* ***pro kio*** *ŝi ploras.* [FE.21] = ... *kaj kial ŝi ploras.*
- *Li amas tiun ĉi knabinon* ***pro ŝia beleco kaj boneco****.* [FE.35]
- *Multe da homoj ne faras malbonon* ***pro timo de mallaŭdo*** *kaj agas bone* ***pro deziro de laŭdo****.* [M.153]

### Celo kiel motivo

*Pro* povas montri ion, kio estas motivo de ago, ĉar oni volas ĝin fari, akiri aŭ atingi, aŭ ĉar oni volas ĝian bonon:

- *Vi afable tion ĉi diras* ***pro komplimento****.* [Rz.44] La motivo estas deziro fari komplimenton.
- *Ili dancadis* ***pro sia propra plezuro****.* [BV.13] La kialo por danci estas deziro fari al si plezuron.
- *Ni batalas* ***pro afero****, kiu alportos al la homaro grandegan utilon.* [FK.266] La motivo por la batalado estas volo efektivigi utilan aferon.
- *Morti* ***pro la patrujo*** *estas agrable.* [FE.20] La motivo por morti estas deziro helpi al la patrujo.
- *Mi la unuan fojon sola eniris en la mondon, por batali* ***pro mia vivo kaj la vivo de mia infano****.* [M.156]

Ĉi tie motivo kaj celo intermiksiĝas, kaj oni ofte povas egale uzi ĉu *pro*, ĉu *por* (§12.3.6.9). Ĉe Zamenhof *pro* estis tute kutima en tia ĉi uzo, sed nuntempe oni ĝenerale preferas *por*, kiu ordinare estas pli klara. La eblo prezenti celon kiel motivon de agado, povas tamen esti utila nuanco.

### Dankomotivo

Oni uzas *pro* ankaŭ por montri motivon de danko:

- ***Pro ĉio*** *akceptu mian plej koran kaj sinceran dankon.* [L1.187] La motivo de la danko estas ĉiuj bonaj aferoj, kiujn vi faris.
- *Mi deziras nur vian feliĉon, iam vi dankos min* ***pro tio****!* [FA1.171]

Ofte oni tamen uzas *por* en tiaj esprimoj (§12.3.6.9).

### Potenco alvokata

Oni uzas *pro* ĉe alvokoj de ia potenco en ekkrioj, ĵuroj, petegoj kaj similaj esprimoj. Motiva signifo normale iel ĉeestas:

- ***Pro la tuta fajro de la infero****, silentu!* [Rt.40]
- ***Pro la ĉielo****, havu kompaton!* [Rt.57]
- *Vi ne devas ellasi la fraŭlinon, ne,* ***pro ĉio en la mondo*** *vi ne devas tion ĉi fari, Hermano!* [Rt.40]
- ***Pro kompato****, sinjorino,* ***pro favorkoreco*** *sidu iom ĉe la infano.* [M.198]

Oni tiel uzas ankaŭ *per* (§12.3.6.7) kaj iafoje *je* (§12.3.1).

### Komercaĵo, pagaĵo

Oni uzas *pro* ankaŭ en tiuj diversaj pagaj, aĉetaj kaj vendaj roloj, kie oni normale uzas *por* (§12.3.6.9):

- *Kion vi postulas* ***pro la poto****?* [FA2.17] *= Kion vi volas por vendi la poton?*
- *Ŝi loĝas nun en sia propra ĉambro kaj pagas al ni lupagon* ***pro ĝi****.* [FA3.59]
- *Vi ricevos la sorĉiston* ***pro buŝelo da mono****.* [FA1.18] *= ... se vi pagos buŝelon da mono.*

- *Ĝi tuj trafu en la gazetojn kaj povu esti vendata **pro du spesdekoj** ĉe ĉiu stratangulo.* [FA3.97]

### *Pro* antaŭ *ke*-frazo

Oni povas uzi *pro* ankaŭ antaŭ *ke*-frazo (§33.2.3), sed intermetas helpan *tio*:

- *Ŝi ekploris **pro tio, ke ŝi estas tiel malbela**.* [FA1.44] = *... ĉar ŝi estas ...*
- *Vi ne devas kulpigi min **pro tio, ke mi ne plenumis vian deziron**.* [M.90]
- *Pro tio ke* = *tial ke* = *ĉar* (§33.6).

### *Pro* = *anstataŭ*

Zamenhof uzis en kelkaj okazoj *pro* en la signifo de *anstataŭ* (§12.3.6.1), verŝajne pro influo de Latino. Oni ne imitu tion: **Niaj infanoj loĝos en la fortikigitaj urboj **pro la loĝantoj de la lando**.** [Nm.32] = *... anstataŭ la loĝantoj de la lando.*

## 12.3.6.12. *Sen*

*Sen* montras ion, kio forestas, kio mankas. *Sen* estas la malo de *kun* (§12.3.6.4), kaj iafoje la malo de *per* (§12.3.6.7):

- *Anstataŭ kafo li donis al mi teon kun sukero, sed **sen kremo**.* [FE.26] Ne estis kremo en la teo.
- *Mi estas malriĉa simpla virino **sen familio**.* [FA3.151] = *... virino, kiu ne havas familion.*
- *Ŝi iras **sen celo**.* [M.98] Ŝi iris ne havante celon.
- *Li pasis preter mi **sen saluto**.* [M.158] = *... ne salutante.*
- *Li preskaŭ **sen vivo** estis pelata de la ondoj.* [FA1.91]
- *"Vi tute ne estas ĝentila," diris la feino **sen kolero**.* [FE.19]
- *Per kia rajto vi, sinjoroj, baras la vojon al ni, por kiuj la irado jam **sen tio** estas tiel malfacila?* [M.173] Jam se vi ne barus la vojon, la irado estus malfacila.
- *Via traduko ne estas **sen certaj bonaj flankoj**.* [M.135] *Sen* troviĝas en nea frazo. La traduko do ja havas certajn bonajn flankojn.
- *Ne **sen kaŭzo** li tion diris.* [FA2.142]
- *Nenia ago fariĝas **sen pago**.* [PE.592]
- *Mi petas vin pri ĝi, – diris Marta **sen plej mallonga pripenso**.* [M.179]
- *Tiu virino ne foriru de ŝi **sen ricevo de konsilo kaj helpo**.* [M.59] Ne manku ricevo de konsilo kaj helpo.
- ***Sen flugiloj** ili sin portadis tra la aero.* [FA1.105] Ĉi tie oni povas diri, ke *sen* estas la malo de *per* (§12.3.6.7).

### *Sen tio ke*

Oni uzas *sen* ankaŭ antaŭ *ke*-frazo (§33.2.3), sed normale oni intermetas helpan *tio*:

- *Via patro neniam povis ekrigardi vin* ***sen tio, ke li batus sin en la bruston kaj ĝemus***. [Rt.40]

### Antaŭ I-verbo

Oni pli kaj pli ofte uzas *sen* antaŭ I-verbo (§27.5): *Ŝi foriris* ***sen diri eĉ unu vorton***.

### Vortfarado

- *Senigi* = "kaŭzi, ke io ne plu havu ion": *Mi* ***senigas*** *min nun je ĉiaj personaj privilegioj.* [AD.8] *Mi* ***senigis*** *al vi la ĝojojn de via juneco.* [Rt.43]
- *Seniĝi* = "liberiĝi je io, forigi ion de si": *Li* ***seniĝis*** *je sia vesto.*

## 12.3.7. Rolvortaĵoj

Ofte E-vorto kunlaboras kun rolvorteto aŭ N-finaĵo. La tuto estas kiel unu rolmontrilo. Ofte povas eĉ ŝajni, kvazaŭ la E-vorto mem estus rolmontrilo. Oni povas nomi tiajn esprimojn **rolvortaĵoj**. Ĉi tie aperos nur kelkaj ekzemploj, ĉar la rolvortaĵoj estas tre multaj, kaj oni povas libere formi novajn. La signifo de rolvortaĵo ĉiam estas komprenebla el ĝiaj partoj.

### Rolvortaĵoj kun *de*

Ekzistas tre multaj esprimoj, kiuj konsistas el E-vorto + *de* (§12.3.2):

- *Meze de* = "en la mezo de": ***Meze de la arbaro*** *apud grupo de laboristoj staris Valdemaro Doe kun siaj tri filinoj.* [FA4.79] *= En la mezo de la arbaro ...* Similaj estas *komence de* (= "en la komenco de"), *fine de* (= "en la fino de"), *ene de* (= "en la eno de" = "en"), *interne de* (= "en la interno de") kaj *ekstere de* (= "ekster").
- *Oriente de* = "ĉe la oriento de, ĉe la orienta flanko de": *Ili starigis sian tendaron en Gilgal,* ***oriente de Jeriĥo***. [Js.4] *= ... ĉe la oriento de Jeriĥo.* Rimarku, ke temas pri loko ekster Jeriĥo. Ne temas pri la orienta parto de Jeriĥo. Similaj estas *okcidente de* (= "ĉe la okcidento de, ĉe la okcidenta flanko de"), *norde de*, *sude de*, *dekstre de*, *maldekstre de*, *flanke de*, *ambaŭflanke de*, *supre de* kaj *sube de*. Se oni celas enan parton, oni uzu *en la oriento de*, *oriente en*, *en la okcidento de*, *okcidente en* k.t.p.: *Mongolujo estas* ***norde de Ĉinujo***, *sed Interna Mongolujo estas* ***en la nordo de Ĉinujo (norde en Ĉinujo)***. Mongolujo estas sendependa lando, sed Interna Mongolujo estas parto de Ĉinujo.
- *Okaze de* = "en okazo de": ***Okaze de la festo de Schleyer*** *ni telegrafe sendu al li en la nomo de la tuta esperantistaro nian koran gratulon.* [OV.404]
- *Pere de* = "per helpo de, per uzo de, per interveno de, per intera rimedo, danke al helpo de", k.s.: ***Pere de konatoj*** *mi povis komuniki kun ŝi. / La libro estis tradukita en la francan* ***pere de*** *la angla.* Oni tradukis el angla traduko, ne el la origina lingvo.

- *Kaŭze de* estas alternativo al *pro* = "el la kaŭzo de": *Ni ofte fariĝas furioj **kaŭze de nia dezirego de amo**.* [M.2] Simila estas *sekve de*.
- *Escepte de* estas alternativo al escepta *krom* (§12.3.6.3) = "kun la escepto de": *Mi ŝatas ĉiujn el ili **escepte de Karlo***. Ankaŭ *escepte* + N-finaĵo estas ebla, vidu ĉi-poste.
- *Inkluzive de* = "kun la enkalkulado de": *Ili pagis ĉion **inkluzive de loĝado kaj manĝado***. La malo estas *ekskluzive de*.

Vidu ankaŭ *fare de* (§12.3.2.2).

## Rolvortaĵoj kun *al*

Multaj rolvortaĵoj konsistas el E-vorto + *al* (§12.3.5.1):

- *Fronte al* estas alternativo al unu signifo de *kontraŭ* = "kun la fronto (antaŭa flanko) direktita al": *La domo staras **fronte al la stacidomo***. Simila estas *vidalvide al*.
- *Konforme al* estas alternativo al *laŭ* = "en maniero, kiu konformas al": *Ĉio fariĝas nur **konforme al la saĝa aranĝo de Dio**!* [FA3.144]
- *Responde al* = "kiel respondo al": ***Responde al via afabla invito** mi devas informi, ke mi bedaŭrinde ne povas partopreni en la kongreso.*
- *Rilate al* estas alternativo al simpla *al*, kiam temas pri agmaniero, kiu direktiĝas al io: *Ili ĉiuj kondutis tre serveme **rilate al ŝi**.* [FA1.37] Pli ofte oni uzas *rilate* + N-finaĵon (vidu ĉi-poste).
- *Spite al* estas simila al *malgraŭ* (§12.3.6.6), sed montras intencan kontraŭstaron = "kiel spitado al": *Tion ĉi mi devas, **spite al la diablo**!* [Rt.40] En la komenco *spite* estis fakte vera rolvorteto (kun E-finaĵo!): *Se ili* [...] ***spite ĉiuj argumentoj*** [...] *tamen elektus ian alian lingvon, tiam kontraŭ tio ĉi protestus la vivo mem.* [FK.269] (En la *Fundamento* la radiko SPIT estas tradukita kiel rolvorteto.) Sed tiu stranga uzo jam delonge malaperis. Oni diru *spite al ĉiuj argumentoj* aŭ *spite ĉiujn argumentojn*. Nur antaŭ *ke*-frazo (§33.2.4) *spite* ankoraŭ povas ŝajni kiel rolvorteto. *Spite ke* tre similas al *kvankam* kaj *malgraŭ (tio) ke* (§33.7).

Legu ankaŭ pri *(mal)proksime al/de* en §12.3.5.1, pri *dank' al* en §10.1, kaj pri *vic' al* en §12.3.6.1.

## Rolvortaĵoj kun *kun*

Kelkaj rolvortaĵoj konsistas el E-vorto + *kun* (§12.3.6.4):

- *Kompare kun* = "en komparo kun": *Vi ĉiuj **kompare kun mi** estas ja nur mizeraj kanajloj!* [FA3.15]
- *Kune kun* estas emfaza varianto de *kun*: *La fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ **kune kun siaj eraroj**.* [FAnt.45]

### Rolvortaĵoj kun N-finaĵo

Rolvortaĵoj, kiuj devenas de objekta ago, povas konsisti el E-vorto + N-finaĵo. Ankaŭ en rolvortaĵoj, kiuj ne devenas de objektaj agoj, oni ofte uzas N-finaĵon:

- *Koncerne* ...N estas alternativo al *pri* = "kiam la afero koncernas ...N": *Ĝi tamen ne havis malbonajn intencojn **koncerne la malgrandan knabinon**.* [FA2.61]
- *Responde* ...N = *responde al*: ***Responde vian leteron** mi sendas la jenan bildkarton esperante, ke ĝi plaĉos al vi.*
- *Inkluzive* ...N = *inkluzive de*: *Jonatan deprenis la tunikon, kiu estis sur li, kaj donis ĝin al David, ankaŭ siajn militajn vestojn, **inkluzive sian glavon, sian pafarkon, kaj sian zonon**.* [Sm1.18] La malo estas *ekskluzive* ...N.
- *Rilate* ...N estas pli ofta ol la samsignifa *rilate al*: *Restas al mi nur diri al vi adiaŭ kaj danki vin por la boneco kaj afableco, kiun vi montris **rilate min**.* [M.59]
- *Escepte* ...N estas ebla alternativo al la pli ofta *escepte de*: ***Escepte** la lastan ĉapitron mi tre ŝatis la libron.*

### Novaj rolvortetoj?

Plurfoje aperis la ideo, ke oni povus transformi rolvortaĵojn en verajn rolvortetojn jene: *flanke de la domo → *flank la domo**, *rilate al tio → *rilat tio**. La kialo estas la ŝajna simileco kun: *apud la domo → apude de la domo*, k.t.p. (kie la vortkreado tamen estas inversa, oni faris rolvortaĵon el rolvorteto). La tuta ideo estas nura fantazio. Ekzistas nenia eblo tiel krei rolvortetojn el ordinaraj radikoj. Krome leviĝas la demando, ĉu elparoli **rílat** laŭ la baza akcentoregulo (§2.1) aŭ **rilát** kvazaŭ estus apostrofita O-vorto.

Legu tamen pri la neoficiala rolvorteto **far** en §19, kiu fakte estas kreita tiamaniere.

### 12.3.8. Memstaraj rolvortetoj

Post rolvorteto normale staras frazparto, al kiu la rolvorteto rilatas. Sen tia posta frazparto, rolvorteto ne havas sencon: *sur **la tablo***, *en **mia domo***, *apud **la aŭto***, *ekster **tiu ĉi ĉambro***, *dum **la paŭzo***, *anstataŭ **tio***, *krom **Petro***, *post **la manĝo*** k.t.p.

Se oni volas ellasi vortojn post rolvorteto (subkompreni ilin), oni devas uzi la rolvorteton kun E-finaĵo, ĉar la rolvorteto tiam fariĝas propra frazparto, kiu rolas kiel komplemento:

- *Li staras apud mi. → Li staras **apude**.*
- *Ŝi sidas ekster la domo. → Ŝi sidas **ekstere**.*
- *Tio okazis dum la paŭzo. → Tio okazis **dume**.*
- *Tio okazos post la kongreso. → Tio okazos **poste**.*

Se tia E-vorto montras lokon, ĝi povas akcepti la finaĵon N por montri movon al la loko (§12.2.5):

- *Li sidas ekster la domo. → Li sidas ekstere. → Li iras* ***eksteren****. = ... al ekstera loko (al loko ekster la domo).*

Se iafoje la origina frazparto rolas kiel priskribo de O-vorto (rolas A-vortece), oni uzas A-finaĵon post la rolvorteto:

- *Li loĝas en domo apud mia domo. → Li loĝas en* ***apuda*** *domo. ... en domo* ***apuda****.*

Sed oni ankaŭ povas uzi lokan aŭ tempan E-vorton en tiaj okazoj (§7.1): *Li loĝas en domo* ***apude****. = Li loĝas en domo, kiu troviĝas apude.*

Ial iuj rolvortetoj apenaŭ aperas praktike kun E-finaĵo aŭ A-finaĵo. Oni ekz. preskaŭ neniam diras *iri dee* = “iri de la loko”, *ala veturo* = “veturo al la loko”, *proa agado* = “agado pro tio”. Sed *pria* kaj *prie* (§12.3.6.10), kiuj tradicie tute ne estis uzataj, lastatempe eĉ fariĝis sufiĉe oftaj.

Legu ankaŭ pri *da* sen posta frazparto, tiel nomata “*da*-ismo” en §12.3.3.3.

## 12.3.9. Forlaso de rolvorteto

Iaj specialaj esprimoj konsistas el du samaj O-vortoj ligitaj per rolvorteto. Ekz. *paŝo post paŝo*, *mano en mano*, *tago post tago*, *vizaĝo kontraŭ vizaĝo*. Tia esprimo aperas plej ofte en frazrolo, kiu principe bezonas ian rolmontrilon. Zamenhof tamen normale ne uzis rolmontrilon ĉe la unua O-vorto. Li plej ofte traktis tiajn esprimojn kiel tutaĵojn, opiniante, ke la rolvorteto inter la du O-vortoj sufiĉas por montri la frazrolon de la tuta esprimo.

Nuntempe multaj preferas uzi N-finaĵon aŭ alian rolmontrilon ĉe la unua vorto, kiam la frazrolo tion postulas. Tio estas gramatike pli logika, sed la zamenhofa dirmaniero restas bona, kaj eĉ sufiĉe eleganta alternativo. Iafoje oni povus alternative E-vortigi la tutan esprimon:

- *Ni* ***paŝo post paŝo****, post longa laboro, atingos la celon en gloro.* [FK.299] Aŭ *... paŝo****n*** *post paŝo ..., ...* ***per*** *paŝo post paŝo ...*
- ***Mano en mano*** *la gefianĉoj promenadis.* [FA3.29] Aŭ *mano****n*** *en mano*, ***kun*** *mano en mano*, *man-en-man****e****.*
- *Sur ĉevalo aŭ sur piedoj ili ĉiam estis kune,* ***flanko ĉe flanko****.* [FA2.140]
- *Ni dormadis* ***kapo ĉe kapo*** *sub la laŭra tegmento de la kabano.* [FA1.228]
- *Ili en longa vico dormis* ***flankon ĉe flanko****.* [FA3.15] Ĉi tie Zamenhof ja uzis rolmontrilon, N-finaĵon.
- *Forte batis* ***koro ĉe la koro****.* [Rt.75] Ĉi tie la unua *koro* estas subjekto, kaj nepre ne havu rolmontrilon.

# 13. Tabelvortoj

## 13.1. Tabelvortoj — bazaj reguloj

En Esperanto ekzistas 45 vortetoj, kiuj estas nomataj **tabelvortoj**, ĉar oni povas ilin aranĝi en tabelo laŭ similaj formoj kaj similaj signifoj.

Oni povas diri, ke ĉiu tabelvorto konsistas el antaŭparto kaj postparto, sed oni tamen ne rigardu la tabelvortojn kiel kunmetitajn vortojn. La tabelvortaj partoj formas apartan, fermitan sistemon, kaj oni normale ne intermiksu ilin kun la ordinaraj vortelementoj en la lingvo. Legu ankaŭ pri tabelvortaj post-partoj kaj ordinaraj finaĵoj en §13.2, kaj pri la demando, ĉu ALI-vortoj povas esti tabelvortoj, en §13.3.

### Antaŭpartoj

| | |
|---|---|
| **KI-** | demandovorto, rilata vorto, ekkria vorto |
| **TI-** | montrovorto |
| **I-** | nedifinita vorto |
| **ĈI-** | tutampleksa vorto |
| **NENI-** | nea vorto |

### Postpartoj

| | | |
|---|---|---|
| **-U** | individua persono aŭ afero | §15.1 |
| **-O** | afero | §15.2 |
| **-A** | eco, speco | §15.3 |
| **-ES** | posedanto (senca objekto, senca subjekto) | §15.4 |
| **-E** | loko | §14.1.1 |
| **-AM** | tempo, fojo (okazo, kondiĉo) | §14.2.1 |
| **-AL** | kaŭzo | §14.3.1 |
| **-EL** | maniero, grado | §14.3.2 |
| **-OM** | kvanto (emfazita grado) | §14.3.3 |

La ĝenerala signifo de ĉiu tabelvorto dependas de ĝiaj partoj. En la praktiko tamen iuj tabelvortoj havas signifojn, kiujn oni devas aparte lerni.

- Klarigoj pri la tabelvortoj je U, O, A kaj ES troviĝas en la paragrafo pri “O-vortecaj kaj A-vortecaj vortetoj” (§15).
- Pri la tabelvortoj je E vidu “E-vortecaj vortetoj lokaj” (§14.1).
- La tabelvortoj je AM troviĝas en “E-vortecaj vortetoj tempaj” (§14.2).
- La tabelvortoj je AL, EL kaj OM estas klarigitaj en la paragrafo pri “E-vortecaj vortetoj ceteraj” (§14.3).

### J-finaĵoj kaj N-finaĵoj post tabelvortoj

La tabelvortoj je U kaj A povas ricevi la finaĵojn J kaj N.

La tabelvortoj je O povas ricevi N, sed normale ne povas ricevi J.

La tabelvortoj je AM, AL, EL, OM kaj ES ne povas ricevi J aŭ N.

La tabelvortoj je E povas ricevi direktan N-finaĵon. Ili ne povas ricevi J.

## La tabelo

Jen la tuta tabelo de la tabelvortoj kun mallongaj difinoj. Pli detalaj difinoj troviĝas en la klarigoj pri la diversaj tabelvortaj familioj:

| | KI- | TI- | I- | ĈI- | NENI- |
|---|---|---|---|---|---|
| **-U** §15.1 | ***kiu*** demandovorto pri individua persono aŭ afero | ***tiu*** montrovorto pri individua persono aŭ afero | ***iu*** nedifinita individua persono aŭ afero | ***ĉiu*** tutampleksa vorto pri individua persono aŭ afero | ***neniu*** nea vorto pri individua persono aŭ afero |
| **-O** §15.2 | ***kio*** kiu afero | ***tio*** tiu afero | ***io*** iu afero | ***ĉio*** ĉiu afero | ***nenio*** neniu afero |
| **-A** §15.3 | ***kia*** de kiu speco | ***tia*** de tiu speco | ***ia*** de iu speco | ***ĉia*** de ĉiu speco | ***nenia*** de neniu speco |
| **-ES** §15.4 | ***kies*** de kiu(j) | ***ties*** de tiu(j) | ***ies*** de iu | ***ĉies*** de ĉiu(j) | ***nenies*** de neniu |
| **-E** §14.1.1 | ***kie*** en kiu loko | ***tie*** en tiu loko | ***ie*** en iu loko | ***ĉie*** en ĉiu loko | ***nenie*** en neniu loko |
| **-AM** §14.2.1 | ***kiam*** en kiu tempo | ***tiam*** en tiu tempo | ***iam*** en iu tempo | ***ĉiam*** en ĉiu tempo | ***neniam*** en neniu tempo |
| **-AL** §14.3.1 | ***kial*** pro kio | ***tial*** pro tio | ***ial*** pro io | ***ĉial*** pro ĉio | ***nenial*** pro nenio |
| **-EL** §14.3.2 | ***kiel*** en kiu maniero/grado | ***tiel*** en tiu maniero/grado | ***iel*** en iu maniero/grado | ***ĉiel*** en ĉiu maniero | ***neniel*** en neniu maniero |
| **-OM** §14.3.3 | ***kiom*** kiel multe | ***tiom*** tiel multe | ***iom*** ne tre multe sed ankaŭ ne malmulte | ***ĉiom*** la tuta kvanto | ***neniom*** nenianombre, neniakvante |

## KI-vortoj

La tabelvortoj je KI estas uzataj en tri manieroj:

- kiel **demandovortoj** (§22.1)
- kiel **rilataj vortoj** (§33.4)
- kiel **ekkriaj vortoj** (§32.1)

- ***Kio** estas tio?* Demanda *kio*.
- ***Kiu** kuraĝas rajdi sur leono?* [FE.7] Demanda *kiu*.
- ***Kiel** vi fartas?* Demanda *kiel*.
- *Fremdulo, diru, **kiu** kaj el **kie** vi estas.* [IT.41] Demandaj *kiu* kaj *kie*.

- *La fera bastono, **kiu** kuŝis en la forno, estas nun brule varmega.* [FE.31] Rilata *kiu*.
- ***Kiam** mi venis al li, li dormis.* [FE.20] Rilata *kiam*.
- *Li estas tiu, **kies** monon vi prenis.* Rilata *kies*.
- ***Kia** granda brulo!* [FE.31] Ekkria *kia*.
- *Fi, **kiel** abomene!* [FE.26] Ekkria *kiel*.
- ***Kion** mi vidas!* [FE.17] Ekkria (kaj demanda) *kio*.

## TI-vortoj

La tabelvortoj je TI estas montraj vortoj. Plej ofte ili montras ion antaŭe diritan aŭ ion poste dirotan. Ili povas ankaŭ almontri ion rekte vidatan, aŭdatan aŭ simile:

- *Mi volas, ke **tio**, kion mi diris, estu vera.* [FE.24] *Tio* montras antaŭe diritan aferon.
- ***Tio** estas mia hejmo.* *Tio* montras ion vidatan (eble kune kun fingromontrado).
- *Li estas **tiel** dika, ke li ne povas trairi tra nia mallarĝa pordo.* [FE.33] *Tiel* almontras la postan *ke*-frazon.
- *Kio estas, kio vin **tiel** afliktas?* [M.55] *Tiel* almontras vidatan aŭ aŭdatan aferon.
- *Ŝi estis en **tiu** momento tre bela.* [M.56] *Tiu* almontras antaŭe menciitan momenton.
- ***Tiu** ĉi malfreŝa pano estas malmola, kiel ŝtono.* [FE.33] *Tiu* almontras ĉeestantan panon.

## I-vortoj

La tabelvortoj je I reprezentas neprecizigitajn aŭ nekonatajn aferojn:

- *Gerda* [...] *ricevis **ion** por manĝi kaj por trinki.* [FA2.71] Oni ne diras, kion ŝi ricevis.
- *Venis **iuj** personoj, kiujn mi ne konas.* Oni ne scias, kiuj estis la personoj.
- *Morti **iam** vi ja devas.* [FA2.136] La tempopunkto estas nekonata.
- *Hodiaŭ estas **ies** tago de naskiĝo.* [BV.14] Oni ne diras, kies naskiĝtago ĝi estas.
- *Mi provis esti kudristino, sed mi **ial** ne sukcesis!* [M.145] Ne estas dirite, kial ŝi ne sukcesis.

## ĈI-vortoj

La tabelvortoj je ĈI havas signifojn tutampleksajn, totalajn:

- *Li faris **ĉion** per la dek fingroj de siaj manoj.* [FE.12] *Ĉio* esprimas la tuton de la aferoj, kiujn li faris.
- ***Ĉiu** homo amas sin mem.* [FE.18] Ne ekzistas persono, por kiu ne validas tio.
- *Tiuj ĉi du amikoj promenas **ĉiam** duope.* [FE.14] Ne ekzistas fojo, kiam ili ne iras duope.

- *Nun **ĉie** regis ĝojo.* [FA1.79] Ne ekzistis loko, en kiu ne regis ĝojo.

Ofte la kunteksto limigas la amplekson de ĈI-vorto:

- *Ŝia fratino en **ĉio** estas kulpa.* [FE.21] Ŝi ne kulpas pri ĉio en la mondo, sed pri ĉiuj aferoj, pri kiuj temas ĝuste nun.
- *La bela muziko ludis **ĉiam** plue.* [FA1.34] *Ĉiam* = seninterrompe dum tiu tuta tempo, pri kiu temas.

### NENI-vortoj

La tabelvortoj je NENI havas signifon nean:

- *La tempon venontan **neniu** ankoraŭ konas.* [FE.22] Ne ekzistas persono, kiu konas la tempon venontan.
- *Mi **neniel** povas kompreni, kion vi parolas.* [FE.28] Ne ekzistas maniero, en kiu mi povas vin kompreni.
- *Kiam mi ien veturas, mi **neniam** prenas kun mi multon da pakaĵo.* [FE.35] Ne ekzistas tia fojo, dum kiu mi prenus multon da pakaĵo al vojaĝo.

Ofte la kunteksto limigas la signifon de NENI-vorto:

- ***Neniu** iam gustumis tian supon, des pli **neniu** ion sciis pri la maniero de ĝia pretigado.* [FA3.126] *Neniu* = neniu el la ĉeestantaj manĝantoj.
- *Krom la kolbasaj bastonetoj* [...] *absolute **nenio** restis.* [FA3.126] *Absolute nenio* = absolute nenio manĝebla.

NENI-vorto sufiĉas por nei la tutan frazon. Legu pli pri tio en la klarigoj pri neado: §21.

## 13.2. Tabelvortaj postpartoj kaj ordinaraj finaĵoj

Kelkaj postpartoj de la tabelvortoj similas al ordinaraj finaĵoj, sed la signifoj ne estas samaj:

- La ordinara O-finaĵo (§37.2.1) kaj la tabelvorta O-parto estas preskaŭ samsignifaj, sed la tabelvortoj je O normale ne akceptas la finaĵon J (§8.1).
- La ordinara finaĵo U estas verba finaĵo por la vola modo (§26.3), dum **la tabela U-parto montras individuojn** – du komplete senrilataj signifoj.
- La ordinara finaĵo A estas ĝenerala priskriba finaĵo (§37.2.2). Ĝi ofte montras ecojn kaj specojn, sed ĝi ankaŭ povas montri apartenon, rilaton, individuecon k.s. **La tabela A-parto montras nur ecojn kaj specojn.**
- La ordinara finaĵo E (§37.2.3) povas montri manieron, tempon, lokon, mezuron, okazon kaj ankoraŭ aliajn signifojn. **La tabela E-parto montras ĉiam nur lokon.**

Normale oni do ne povas uzi la tabelajn antaŭpartojn kaj postpartojn kune kun ordinaraj elementoj de la lingvo, ĉar la signifoj konfuziĝus. Principe la tabelvortoj estas nekunmetitaj, nedisigeblaj, kvankam ili ŝajnas kunmetitaj.

Ekzistas tamen manpleno da tradiciaj vortoj, kiuj miksas tabelvortajn partojn kun ordinaraj sufiksoj. Oni forigis la O-parton aŭ la A-parton de tabelvorto

kaj aldonis sufikson: _neniaĵo_, _nenieco_, _neniigi_, _neniiĝi_ (§15.2) kaj _tiaĵo_ (§15.3). Ili ne kreas konfuzon, kaj estas tial ne-danĝeraj.

## 13.3. Ĉu ALI-vortoj povas esti tabelvortoj?

Multfoje oni proponis aldoni al la tabelvortoj la antaŭparton *ALI-* kreante la novan serion _*aliu*_°, _*alio*_°, _*alia*_°, _*alies*_, _*alie*_°, _*aliam*_°, _*alial*_°, _*aliel*_, _*aliom*_°. Iuj eĉ praktikas tion uzante precipe la vortojn _*aliel*_ kaj _*alies*_.

En oficiala Esperanto ALI tamen estas ordinara radiko, el kiu oni faras vortojn per la ordinaraj finaĵoj:

- _alia_ = ne la sama, diferenca
- _alio_ = io alia
- _alie_ = en alia okazo, en alia maniero
- _alii_ = esti alia, diferenci (malofte uzata)

Ekuzo de la novaj tabelvortoj kunportus gravajn problemojn kaj drastajn lingvoŝanĝojn. Multaj "alielistoj" konscias, ke _alie_ ŝanĝus sian signifon al "en alia loko", sed la sekvoj estus multe pli grandaj ol tio.

_Alia_ en normala Esperanto signifas "de alia speco" aŭ "kun alia identeco" (§5.2). La nova tabelvorto _*alia*_ signifus nur "de alia speco". Konsekvencaj alielistoj do ne plu diru: _La alia ĉambro estas pli granda._ Sed: _*La aliu ĉambro estas pli granda.*_ Ili ankaŭ devus diri: _*Ili amas unu la aliun.*_ En normala Esperanto _aliu_ estas apenaŭ uzata, sed signifas principe "estu ali(ec)a", ĉar ĝi simple estas la U-modo de la ĉi-antaŭe menciita verbo _alii_.

> **Noto:** Oni povas tamen dubi, ĉu estus logike uzi _la_ antaŭ _*aliu*_, ĉar antaŭ veraj tabelvortoj je U oni ne povas uzi _la_ (§9.1.1). Estas malfacile diri, ĉu _*aliu*_ signifus "la alia" aŭ simple "alia". Sed tio ja ne gravas, ĉar la tabelvorto _*aliu*_ ĉiuokaze ne estas ĝusta Esperanta vorto.

Oni ofte faras kunmetaĵojn kiel: _de alia speco → alispeca_; _kun alia formo → aliforma_; _en alia signifo → alisignife_. Alielistoj tamen devus diri: _*ali-uspeca*_, _aliaforma_, _*aliusignife*_, ĉar oni ne povas forigi la postpartojn de tabelvortoj. Komparu kun: _de tiu speco → tiuspeca_ (ne: _*tispeca*_); _kun tia formo → tiaforma_ (ne: _*tiforma*_); _en tiu signifo → tiusignife_ (ne: _*tisignife*_). Oni povas renkonti la formon _*interaliel*_ anstataŭ la regula kaj normala _interalie_ (= _inter aliaj aferoj_). _*Interaliel*_ estas tute mallogika. Ali-elistoj devus logike uzi ion similan al _*interaliue*_ (= _*inter aliuj aferoj*_).

La ordinara _alie_ plej ofte signifas "en alia okazo": _Mi ja bezonas manĝi. **Alie** mi povas tute maldikiĝi._ [Rz.25] Ĝi ankaŭ povas signifi "en alia maniero": _Mi ankaŭ iros en la palacon, ĉar mi ne povas agi **alie**!_ [FA1.71] La proponita tabelvorto _*aliel*_ povas tamen signifi nur "en alia maniero" (kaj eble "en alia grado"). Tamen multaj alielistoj uzas _*aliel*_ ankaŭ por "en alia okazo". Logike ili devus tiam uzi _*aliuokaze*_ aŭ _*aliam*_: _Mi ja bezonas manĝi. ***Aliam*** mi povas tute maldikiĝi._ La vorto _*aliel*_ estas do ne nur reformo, sed eĉ mallogike uzata reformo.

El la novaj tabelvortoj povus esti iom utila nur _*alies*_, per kiu estus eble simpligi iujn specojn de frazoj: _Li ne uzis mian ĉambron, sed tiun de alia persono. → *Li ne uzis mian ĉambron, sed **alies**.*_ Por ĉiuj aliaj novaj tabel-

vortoj Esperanto jam havas tute bonajn esprimilojn, kaj eĉ por **alies** ekzistas tute uzinda alternativo, kiu ne postulas reformadon de la baza lingva sistemo, nome *aliula* (kaj eble ankaŭ *aliies* = *ali-ies*), vidu ĉi-poste. La eventualaj avantaĝoj de la nova tabelserio estas do tre malgrandaj, des pli se oni komparas kun la grandegaj problemoj kaj miskomprenoj, kiujn kaŭzus tia reformo.

Tiuj ĉi reformproponoj tute ne venas de ia reala bezono, sed de la hazarda fakto, ke la radiko ALI finiĝas per "i". Se la vortoj estus ekz. **altra**, **altre**, **altro** k.t.p., tiam verŝajne venus al neniu en la kapon, ke oni bezonas tabelvortojn por tio. Oni povas kompari kun la radiko SAM, kiu estas la malo de ALI. SAM ne finiĝas per "i". Sekve neniu proponis diri: **samel**, **samam**, **sames** k.t.p., kvankam la bezono de tiaj vortoj devus esti same granda, kiel la bezono de **aliel**, **aliam**, **alies** k.t.p.

Ankoraŭ neniu praktikis la plenan tabelserion je ALI en konsekvenca maniero. Ekzistas nur senpripensa kaj mallogika uzado de **aliel** kaj **alies**, kaj okaze de **aliu**. Iuj uzas parte klasikan Esperanton, parte la reformitan dialekton. Kiam ili diras ekz. *alie* aŭ *alia*, oni ne povas scii, ĉu kompreni laŭ la Fundamenta lingvo, aŭ laŭ la nova dialekto. Feliĉe tamen plej multaj ankoraŭ uzas la lingvon regule kaj logike.

Iafoje oni renkontas la argumenton, ke tute ne temas pri plena tabelvortigo de ALI, sed nur pri unu aŭ du tiaj vortoj, ekz. nur **alies** aŭ nur **aliel** aŭ simile. Laŭ tiu rezonado *alie*, *alia* kaj *aliu* retenu sian normalan signifon, kaj ĉio devus esti en ordo. Sed ne multe gravas, kion la uzantoj de tiaj novaj vortoj intencas. Gravas, ke la nura uzo de ekz. **aliel** aŭ **alies** aŭtomate supozigas la ekziston de la plena familio de tabelaj ALI-vortoj. Komencanto, kiu renkontas la vorton **aliel**, lernante, ke ĝi signifas "en alia maniero", pro tio tute logike konkludas, ke *alie* devas signifi "en alia loko", kaj sekve mislernas Esperanton.

**La ŝajne senkulpaj vortetoj **aliel** kaj **alies** kunportas tiom da ŝanĝoj kaj malstabiligoj, ke oni devas rigore deadmoni de ilia uzo, kaj de ĉiaj provoj vastigi la tabelon.** Uzu la jam ekzistantajn tabelvortojn, kaj esprimu aliajn aferojn per ordinaraj radikoj laŭ la reguloj de la Fundamenta Esperanto. De tiuj, kiuj volas krei novajn tabelvortojn, oni devas postuli, ke ili almenaŭ trapensu, kiajn sekvojn havus la reformo, antaŭ ol ekuzi la novajn vortojn.

| **Evitenda reformo** | **Oficiala Esperanto** |
| --- | --- |
| **aliu** | *alia*, *aliulo* |
| **alia** | *alia*, *alispeca*, *alieca* |
| **alies** | *de alia (persono)*, *aliula* |
| **alie** | *aliloke* |
| **alien** | *aliloken* |
| **aliam** | *alifoje*, *aliokaze* |
| **alial** | *alikaŭze* |
| **aliel** | *alimaniere*, *alie* |
| **aliom** | *alikvante* |

*Aliula* signifas “rilata al aliulo (= alia persono)”, kio laŭ la kunteksto povas esti ekz. “posedata de aŭ apartenanta al alia persono”. *Aliulo* kaj *aliula* ne estas tre kutimaj vortoj, sed plene regulaj: *Agu kun* ***aliuloj*** *tiel, kiel vi dezirus, ke* ***aliuloj*** *agu kun vi.* [OV.342] Uzo de *aliula* anstataŭ **alies** forigas la solan okazon, en kiu tabela ALI-vorto povus esti iom utila. Krome *aliula* povas porti J-finaĵon kaj N-finaĵon, kaj estas do ofte pli klara ol **alies**. La ekzemplo kun **alies** fariĝas tiam: *Li ne uzis mian ĉambron, sed* ***aliulan***.

Oni ofte proponas la “kompromisajn” formojn *aliio*, *aliiu*, *aliies*, *aliia*, *aliie*, *aliiel* k.t.p. (kunmetaĵoj de la radiko ALI kun tabelvortoj je I). Tiaj vortoj ja estas regulaj, kaj ne malmultaj uzas tiujn formojn, sed bedaŭrinde ne estas facile aŭdi la distingon inter *aliie* kaj *alie*, inter *aliia* kaj *alia*, k.t.p.

# 14. E-vortecaj vortetoj

E-vortecaj vortetoj (aŭ E-ecaj vortetoj) rolas en frazo kvazaŭ ili estus E-vortoj. Tabelvortoj je OM povas ankaŭ roli O-vortece. La E-vortecaj vortetoj estas ĉi tie dividitaj en tri grupojn:

- Lokaj E-vortecaj vortetoj (§14.1)
- Tempaj E-vortecaj vortetoj (§14.2)
- Ceteraj E-vortecaj vortetoj (§14.3)

E-vortecaj estas ankaŭ la vortetoj *ne* (§21), *jes* (§22.4), *ju* kaj *des* (§17.4).

## 14.1. E-vortecaj vortetoj lokaj

### 14.1.1. Tabelvortoj je E

| | |
|---|---|
| ***kie*** | en kiu loko |
| ***tie*** | en tiu loko |
| ***ie*** | en iu loko |
| ***ĉie*** | en ĉiu loko |
| ***nenie*** | en neniu loko |

#### *Kie*

- ***Kie** estas la libro kaj la krajono?* [FE.6] = *En kiu loko estas la libro ...* Demanda *kie*.
- *– **Kie** estas la tranĉiloj? – Ili kuŝas sur la tablo.* [FE.16] = *En kiu loko estas ...* Demanda *kie*.
- *Mi montris al la infano, **kie** kuŝas ĝia pupo.* [FE.18] *Kie* en demanda subfrazo.
- *Li scias, **kie** la kankroj pasigas la vintron.* [PE.995] *Kie* en demanda subfrazo.
- *Mi volis resti tie, **kie** mi estis.* [FA3.135] Rilata *kie*.
- ***Kie** fumo leviĝas, tie fajro troviĝas.* [PE.399] Rilata *kie*.

#### *Tie*

- *En la kastelo estis granda societo, **tie** troviĝis multe da gastoj el la ĉirkaŭaĵo.* [FA3.49] *= ..., en tiu loko (en la kastelo) troviĝis ...*
- *La plafono **tie** estis malalta.* [M.105] *= La plafono en tiu loko estis malalta.*
- *Ŝtelisto ŝteliston evitas, ĉar li **tie** ne profitas.* [PE.316] *Tie = ĉe ŝtelisto.*
- *Se li scius, ke mi estas **tie** ĉi, li tuj venus al mi.* [FE.20] *= ... estas en tiu ĉi loko proksime de mi, li tuj ...* Pri *ĉi* vidu ĉi-poste. (§14.1.2)
- *Li demandis ŝin, kion ŝi faras **tie** ĉi tute sola.* [FE.21]
- *Mi restas **tie** ĉi laŭ la ordono de mia estro.* [FE.26]
- ***Tie kaj tie** en la arbaro loĝas homoj. Tie kaj tie* aŭ *tie kaj ĉi tie* (aŭ simile) = “en kelkaj disaj lokoj”.

Iafoje kiam ĉeestas rilata *kie*-subfrazo, *tie* povas esti forlasata: §33.4.3.

### *Ie*

- *Ĉu vi loĝas **ie**? = Ĉu vi loĝas en iu loko?*
- *Certe ĝi troviĝas **ie** ĉi tie, tion mi scias.*

### *Ĉie*

- ***Ĉie** estas varme, sed hejme plej ĉarme.* [PE.536] = *En ĉiu loko estas ...*
- *Kion mem mi faras, tion **ĉie** mi flaras.* [PE.308]
- ***Ĉie**, kien mi venas, troviĝas ia malbonaĵo, kiu premas la koron.* [FA1.144]
- *Nun **ĉie** regis ĝojo.* [FA1.79]

### *Nenie*

- ***Nenie** mi havis tian bonan akcepton.* [Rz.80] = *En neniu loko mi havis ...*
- *Pli bela reĝidino ol ŝi troviĝis **nenie** en la mondo.* [FA1.162]
- *Kiu kutimis ĉion juĝi, **nenie** povas rifuĝi.* [PE.1078]

### Lokaj tabelvortoj kun rolvortetoj

Oni povas aldoni rolvortetojn al lokaj tabelvortoj por montri moviĝon k.s.:

- *Sonorado al li venas, sed **de kie** – li ne komprenas.* [PE.978] = *... sed de kiu loko ...*
- *For **de tie ĉi**!* [FE.26] = *Iru for ...*
- *Ho, se vi estus malproksime **de ĉi tie**!* [FA2.37]
- ***El kie** vi estas?* [FA2.37] = *El kiu loko ...*
- *Ĉiuj sociaj klasoj, aĝoj, nacioj puŝiĝas tie, **tra kie** mi intencis iri.* [M.39]
- *Se la pordo de la ĝardeno estis ne fermita, li povus **tra tie** eniri.* [BV.77]

### Direktaj tabelvortoj

Post lokaj tabelvortoj oni povas meti N-finaĵon por montri direkton (§12.2.5):

| | |
|---|---|
| ***kien*** | al kiu(j) loko(j), en kiu(j) direkto(j) |
| ***tien*** | al tiu(j) loko(j), en tiu(j) direkto(j) |
| ***ien*** | al iu(j) loko(j), en iu(j) direkto(j) |
| ***ĉien*** | al ĉiu(j) loko(j), en ĉiu(j) direkto(j) |
| ***nenien*** | al neniu(j) loko(j), en neniu(j) direkto(j) |

- ***Kien** vi iras? – Mi iras en la ĝardenon.* [FE.26]
- ***Kien** vi vin turnos, ĉie malbone.* [PE.215]
- *Fadeno iras, **kien** kudrilo ĝin tiras.* [PE.1024]
- *Rigardu **tien ĉi**.* [BV.79]

- *Kun helpo de Dio mi trabatis al mi vojeton rekte **tien, kien** estis necese.* [Gm.58]
- *Kiam mi, la sonorilo* [...], *svingiĝadis **tien** kaj reen, mi povus frakasi al li la frunton.* [FA4.69]
- *La malvivan korpon li **ien** trenis for.* [H.113]
- *La infano* [...] *turnadis **ĉien** la okulojn, en kiuj vidiĝis miro kaj timo.* [M.7]
- *Mi **nenien** plu iros hodiaŭ.* [M.128]

## Vortfarado

- *Tiea*, *ĉi-tiea* [FE.30], *ĉiea* k.t.p. = "troviĝanta tie, ĉi tie, ĉie" k.t.p.: *Ĉiuj personoj, kiuj partoprenis en la **tiea** kongreso, konservis pri ĝi la plej agrablan kaj plej entuziasman memoron.* [OV.373] *Kiel urbestro de la **ĉi-tiea** urbo mi havas la devon zorgi pri tio, ke al la traveturantoj* [...] *estu nenia premado.* [Rz.29] *La **ĉiea** pluvo detruis nian vojaĝon.*

## 14.1.2. *Ĉi*

La vorteto *ĉi* montras proksimecon al la parolanto. *Ĉi* estas normale uzata kune kun tabelvorto je TI (§13.1). *Ĉi* povas stari ĉu antaŭ, ĉu post la tabelvorto. *Ĉi* ne povas ricevi finaĵojn.

Simpla TI-vorto ĉiam montras ion ne tute proksiman al la parolanto. TI-vorto + *ĉi* montras ion proksiman al la parolanto:

- *tie* = en tiu loko → *tie **ĉi**, **ĉi** tie* = en tiu ĉi loko proksime de mi
- *tiu domo* (for de mi) → *tiu **ĉi** domo, **ĉi** tiu domo* (proksima de mi)
- *tio* = tiu afero (for de mi) → *tio **ĉi**, **ĉi** tio* = tiu ĉi afero
- *tiel* = en tiu maniero → *tiel **ĉi**, **ĉi** tiel* = en tiu ĉi maniero (kiun mi montras)

*Ĉi tiam* aŭ *tiam ĉi* ne estas praktike uzataj. Anstataŭe oni uzas *nun* (§14.2.7).

> **Noto:** La preciza nuanco de *ĉi tiam* estas malklara, ĉar ĝi apenaŭ estas uzata. Oni povus diskuti, ĉu *ĉi tiam* estas preferinda, kiam temas pri okazoj kaj kondiĉoj, dum *nun* ordinare estas tempa. Eble tempa *ĉi tiam* povas esti malpli forte ligita al la absoluta nuno ol *nun*, montrante tiun tempon, kiun la rakonto atingis.

Oni iafoje uzas *ĉi* ankaŭ kune kun la tabelvortoj je ĈI (§13.1). Tiam oni povus diri ke TI-vorto estas subkomprenata:

- *ĉio* = ĉiuj aferoj → *ĉio **ĉi**, **ĉi** ĉio* = ĉiuj ĉi tiuj aferoj, ĉio tio ĉi
- *ĉie* = en ĉiuj lokoj → *ĉie **ĉi**, **ĉi** ĉie* = en ĉiuj tiuj ĉi lokoj, ĉie ĉi tie

Ne konfuzu la vorteton *ĉi* kun la tabela antaŭparto ĈI (§13.1). Ili havas tute malsamajn signifojn.

Normale estas egale, ĉu oni metas *ĉi* antaŭ aŭ post la tabelvorto, sed iafoje la loko de *ĉi* estas grava. Oni prefere ne diru ekz. **tie ĉi tiu knabino loĝas**, ĉar estas malklare, ĉu *ĉi* apartenas al *tie* aŭ al *tiu*. Diru ekz. *ĉi tie tiu knabino loĝas*, aŭ *tie tiu ĉi knabino loĝas*, depende de la signifo.

*Ĉi* estas aparta vorto. Ne skribu: **ĉi-tiu**, **tiu-ĉi**, **ĉi-tie**, **tie-ĉi**, **ĉio-ĉi** k.t.p. Skribu: *ĉi tiu*, *tiu ĉi*, *ĉi tie*, *tie ĉi*, *ĉio ĉi* k.t.p. Se oni skribus **tiu-ĉi**, **tie-ĉi**, **ĉio-ĉi**, oni devus akcenti: **ti**ú**-ĉi**, **ti**é**-ĉi**, **ĉi**ó**-ĉi**, laŭ la

akcentoregulo (§2.1), sed tiel neniu elparolas. Oni do ankaŭ ne skribu tiel. Sed oni povas el tiaj esprimoj fari aliajn kunmetaĵojn, kaj tiam oni ja kunskribu, kaj ofte oni tiam uzas dividostrekon post *ĉi* (vidu ĉi-poste).

Teorie oni povus uzi *malĉi* por montri malproksimecon, sed tiu formo tute ne estas uzata. Formoj kiel *tie for*, *tiu for* estas iafoje provataj, sed restas maloftaj.

### Memstara *ĉi*

Okaze oni uzas *ĉi* memstare. Tiam plej ofte la vorteto *tie* estas subkomprenata. *Ĉi* restas aparta vorto. Tia uzo estas plej ofta en poezio, sed kelkaj provas ĝin ankaŭ en ordinara lingvaĵo:

- ***Ĉi** ne estas akvo!* [FA1.150] = ***Ĉi tie** ne estas akvo!*
- *Neniu magazeno **ĉi** estas!* [FA1.119] = *Neniu magazeno **ĉi tie** estas.*

Nuntempe populariĝis uzo de memstara *ĉi* anstataŭ *tiu ĉi*, *tiun ĉi*, *tiuj ĉi* aŭ *tiujn ĉi*. En tiaj frazoj la vorteto *tiu(j)(n)* estas subkomprenata:

- ***Ĉi** libron mi ŝatas.* = ***Ĉi tiun** libron mi ŝatas.*
- *Mi tre admiras **ĉi** francajn verkistojn.* = *Mi tre admiras **tiujn ĉi** francajn verkistojn.*

En tia uzo *ĉi* transprenis la rolon de *tiu(j)*, kaj fariĝis mem difinilo (§9).

Iuj opinias, ke memstara *ĉi* anstataŭ *ĉi tiu(j)* estas evitinda (krom eble en poezio).

Ankaŭ en tiaj ĉi okazoj estus eraro uzi dividostrekon. Ne skribu **ĉi-libro** aŭ **ĉi-francajn verkistojn**. Tio estus same erara kiel **tiu-libro**, **la-libro**, **tiujn-francajn verkistojn**, **la-francajn verkistojn**.

### *Ĉi* = "ĵus menciita"

Oni ofte uzas *ĉi* por montri ĵus menciitan aferon. Temas tiam pri proksimeco en la parolo, ne pri proksimeco al la parolanto:

- ***Tiu ĉi** opinio estas tute erara.* [FK.283] = *La opinio, kiun mi ĵus menciis estas ...*
- *Vi estas la patro de Karolo de Moor. – De kie vi **tion ĉi** scias?* [Rt.46] = *De kie vi scias tion, kion vi ĵus diris?*
- *Li ellasis la kolombon, kaj **ĉi tiu** jam ne plu revenis al li.* [Gn.8] *Ĉi tiu = la (ĵus menciita) kolombo.*
- *Unu el la abeloj pikis lin en la mano, tiel ke li elfaligis <u>la florpoton</u>, kaj **ĉi tiu** rompiĝis.* [FA2.15] *Ĉi tiu = la (ĵus menciita) florpoto.*

Ofte *ĉi* ne estas vere necesa en tiaj frazoj, sed nur aldonas ian viglan nuancon. Iafoje, kiam oni faras distingon inter du aferoj, estas tamen grave, ĉu oni uzas aŭ ne uzas *ĉi*. Por la pli ĵuse menciita oni uzu TI-vorton kun *ĉi*, dum por pli frue menciita afero oni uzu TI-vorton sen *ĉi*:

- *En nia loko ne estas moro, ke oni donu la pli junan* [filinon] *antaŭ ol la pli maljunan. Pasigu semajnon kun **ĉi tiu*** [= la pli maljuna]*, tiam mi donos al vi ankaŭ **tiun*** [= la pli junan]. [Gn.29]

- *La vojkamarado tion aŭdis, kaj en la sama momento, kiam la reĝidino englitis tra la fenestro en sian dormoĉambron kaj la sorĉisto volis ekflugi returne, li* [= la vojkamarado] *kaptis **ĉi tiun*** [= la sorĉiston, ne la reĝidinon] *je lia longa nigra barbo kaj dehakis al li per la sabro lian abomenindan kapon.* [FA1.78]

Iafoje oni aldonas la vorton *lasta(j)* por maksimuma klareco:

- *La virino* [...] *ekridis per mallonga, seka rido, kies sono, kontrastante kun ŝia tuta freŝa eksteraĵo, harmoniis kun la velkinteco de la frunto kaj, simile al **tiu ĉi lasta*** [= la velkinta frunto, ne la freŝa eksteraĵo], *povis veki rilate ŝin malkonfidon aŭ kompaton. Marta videble sentis **tiun ĉi lastan** senton* [= kompaton, ne malkonfidon]. [M.151]

Kiam oni uzas *lasta(j)* oni povas forlasi *ĉi*: *Grandaj ŝipoj povis naĝi sub la superpendantaj branĉoj, kaj en **tiuj lastaj*** [= la branĉoj, ne la ŝipoj] *loĝis najtingalo.* [FA2.24] Oni povas ankaŭ fari distingon per *la unua* kaj *la lasta* aŭ simile.

Nuntempe oni sufiĉe ofte mallongigas la esprimon *tiu(j) ĉi lasta(j*) al *ĉi lasta(j)*: *Mi renkontis Karlon kaj Petron. **Ĉi lasta*** [= Petro] *estas malnova amiko de mi.* Iafoje oni vidas la skribon *ĉi-lasta(j)*, kiu plej ofte estas erara, ĉar ne temas pri vortkunmetado, sed pri subkompreno de la vorto *tiu(j)*. Tamen *ĉi-lasta(j)* povas esti senerara, se oni uzas apartan difinilon (*la*, *lia*, *ilia* k.s.), kaj komprenas *ĉi-lasta(j)* kiel vortigon de la frazeto *tie ĉi laste menciita* (aŭ simile): ***La ĉi-lastaj** ekzemploj gravas.* = *La tie ĉi laste menciitaj ekzemploj gravas.* ***La ĉi-lasta*** [afero] *estas mia.* = *La tie ĉi laste montrita* [afero] *estas mia.*

Legu ankaŭ pri simila distingo inter *tiu* kaj persona pronomo en §15.1.

## *Ĉi* en kunmetitaj vortoj

Oni ofte faras A-vorton aŭ E-vorton el frazparto, kiu enhavas la vorteton *ĉi*. Tiam la tuta esprimo fariĝas unu vorto (§37.4). Normale la TI-vorto malaperas. Por klareco oni kutimas meti dividostrekon (§1.2) post *ĉi* en tiaj vortoj:

- *ĉi tie* → *ĉi-tiea* [FE.30]: *Kiel urbestro de la **ĉi-tiea** urbo mi havas la devon zorgi pri tio, ke al la traveturantoj kaj al ĉiuj noblaj homoj estu nenia premado.* [Rz.29] = *... de la urbo, kiu troviĝas ĉi tie ...*
- *en tiu ĉi nokto* → *ĉi-nokte*
- *sur ĉi tiu flanko* → *ĉi-flanke*
- *la somero de tiu ĉi jaro* → *la ĉi-jara somero*
- *sub tio ĉi* → *ĉi-sube*: *Ni donas **ĉi-sube** la protokolon de la lasta kunsido.* = *... poste en tiu ĉi teksto ...*
- *ĉe la supro de tio ĉi* → *ĉi-supre*: *La **ĉi-supre** citita teksto estas de Privat.* = *La teksto citita pli supre ...*
- *kun tio ĉi* → *ĉi-kune* = *Bonvolu trovi **ĉi-kune** modestan donacon.* = *... kun tiu ĉi sendaĵo ...*
- *Vi malgranda griza **ĉi-landa** birdo!* [FA1.139] = *... birdo de tiu ĉi lando!*

Oni povus konservi la TI-vorton: *tiu-ĉi-nokte*, *ĉi-tiu-flanke*, *tiu-ĉi-jara*, k.t.p., sed tiajn vortojn oni normale ne uzas.

Principe oni tute rajtas skribi tiajn kunmetaĵojn ankaŭ sen dividostreko: *ĉitiea*, *ĉinokte*, *ĉiflanke*, *ĉijara*, *ĉisube*, *ĉisupre*, *tiuĉinokte*, *ĉitiuflanke*, *tiuĉijara*. Sed preskaŭ neniam oni vidas tian skribon en la praktiko.

Rimarku, ke kunmetaĵoj kun prefikseca *ĉi* ĉiam havas A-finaĵon aŭ E-finaĵon. O-vortoj kun prefikseca *ĉi* ne estas eblaj.

### 14.1.3. *For*

#### Mova *for*

Plej ofte *for* montras moviĝon de unu loko al alia (normale malproksima) loko:

- *Iru **for**!* [FE.20] = *Iru de (ĉi) tie al alia (malproksima) loko.*
- *La tuta ĝojo de la tero flugis **for**, kaj restis sole ĝemo!* [Rt.75]
- *Clemency* [...] *vekiĝis kaj rapidis **for**, por rigardi la infanojn.* [BV.79]
- *Ŝi demetis la tukon **for** de la kapo.* [M.169]
- *Ĉevaloj fortiradis ilin* [= la dehakitajn arbojn] *de tie **for** el la arbaro.* [FA2.43]

#### Senmova *for*

*For* ankaŭ povas montri troviĝon en alia (malproksima) loko:

- *Grandaj vojaĝoj kaj longa restado **for** de mia hejmo estas por mi afero tre malfacila.* [L2.236]
- *Marta staris jam kelke da paŝoj **for** de ŝi.* [M.161]

Se la alia loko ne estas montrata, *for* signifas normale "malaperinta", "en loko nekonata":

- *La pilko tute malaperis kaj plu ne revenis. La knabo serĉis kaj serĉis, sed ĝi estis kaj restis **for**.* [FA2.33]

Oni povas uzi solan *for* en la signifo "malproksime, malproksima", nur kiam la kunteksto malebligas miskomprenon. Oni ne diru: *lia hejmo estas **for***, se la signifo estas *lia hejmo estas malproksime*, ĉar *lia hejmo estas **for*** kompreniĝas normale kiel *lia hejmo estas malaperinta*. Tamen, se oni diras ekz. *lia hejmo estas **tre for***, oni tion povas kompreni nur kiel *lia hejmo estas tre malproksime*, ĉar "tre malaperinta" estas tro stranga ideo.

#### Ekkria *for*

*For* estas ofte uzata kiel ekkria vorto. Tiaj esprimoj montras, ke oni volas, ke io malaperu. Oni povas diri, ke temas pri mallongigitaj frazoj:

- ***For** de tie ĉi!* [FE.26] = *Malaperu for de tie ĉi!*
- ***For**, **for** de mi!* [...] ***For** de miaj okuloj.* [Rt.29] = *Iru for, iru for de mi. Iru for de miaj okuloj.*
- ***For** en la balaaĵon!* [FA3.45] = *Falu for en la balaaĵon!*

- ***For** tiun ĉi bildon!* [Rt.93] *= Prenu for tiun ĉi bildon.*
- ***For** la manojn!* [H.30] *= Movu for la manojn!*
- ***For**, **for** lia sceptro kaj trono — Vin mem mi deziras, aminda!* [UL.23] *= Malaperu for ...*

## Vortfarado

- *Fora* = "malproksima": *Ili venas de **foraj** landoj. Fora* ĉiam estas senmova.
- *Fore* = senmova *for*: *La butiko estas **fore** je ducent metroj.*
- *Foren* = mova *for*: *Nun ni rajdas multe da mejloj **foren**!* [FA2.80] *Li eksopiris **foren** el sia patrujo, for, for en la malproksiman mondon.* [FA3.62]

*Fore* kaj *foren* povas esti uzataj por fari distingon inter mova kaj senmova *for*. *Fore* estas sufiĉe malofta, dum *foren* estas pli ofta. *Foren* estas ankaŭ uzata simple kiel akcenta formo de mova *for*.

## 14.2. E-vortecaj vortetoj tempaj

### 14.2.1. Tabelvortoj je AM

| | |
|---|---|
| ***kiam*** | en kiu tempo, en kiu fojo |
| ***tiam*** | en tiu tempo, en tiu fojo |
| ***iam*** | en iu tempo, en iu fojo |
| ***ĉiam*** | en ĉiu tempo, en ĉiu fojo |
| ***neniam*** | en neniu tempo, en neniu fojo |

#### *Kiam*

- *Sed **kiam** tio okazis?* [FA2.48] Demanda *kiam* pri tempo pasinta.
- *Kaj **kiam** vi reiros?* [Rt.76] Demanda *kiam* pri tempo estonta.
- *Li skribis al mi, ke li intencas ĝin eldoni, sed li ne skribis ankoraŭ **kiam** li ĝin eldonos.* [OV.493] Demanda *kiam* (subfraza demando) pri estonta tempo.
- *En unu tago, **kiam** ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino.* [FE.15] Rilata *kiam*.
- ***Kiam** mi venis al li, li dormis.* [FE.20] Rilata *kiam*.

#### *Tiam*

- *Mi ĝin vidis unu minuton, sed mi **tiam** estis ankoraŭ dormanta!* [FA2.137] *Tiam* montras la antaŭe diritan minuton.
- *Post la kongreso mi estos morale pli libera, kaj **tiam** mi povos plenumi la deziron de la Pariza Grupo.* [L1.158] *Tiam* montras la antaŭe menciitan estontan tempon.
- *Li vekiĝis nur **tiam**, kiam la suno leviĝis.* [FA1.62] *Tiam* almontras la postan *kiam*-frazon.

- *Kiam Nikodemo batas Jozefon, **tiam** Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo estas la batato.* FE.22 *Tiam* almontras la antaŭan *kiam*-frazon.

Iafoje kiam ĉeestas rilata *kiam*-subfrazo, *tiam* povas esti forlasata: §33.4.3. Legu ankaŭ pri *ĉi tiam* en §14.1.2.

### *Iam*

- *Ŝajnas al mi, ke ĉi tiun vizaĝon mi jam **iam** vidis!* FA2.111 *Iam* reprezentas nedifinitan pasintan tempon.
- *Neniu **iam** gustumis tian supon.* FA3.126 *Iam* reprezentas iun ajn pasintan tempon.
- *Ŝi estis ja la plej bela knabino, kiun li **iam** vidis.* FA1.53 *Iam* reprezentas iun ajn pasintan tempon.
- *Morti **iam** vi ja devas.* FA2.136 *Iam* reprezentas nedifinitan estontan tempon.

### *Ĉiam*

- *Oni diras, ke la vero **ĉiam** venkas.* FE.16 *Ĉiam* = en ĉiu tempo, ĉu pasinta, ĉu estanta, ĉu estonta.
- *Li **ĉiam** diradis al mi la veron.* FE.24 *Ĉiam* = en ĉiu pasinta tempo.
- *Tiu ĉi grava tago restos por mi **ĉiam** memorinda.* FE.41 *Ĉiam* = en ĉiu estonta tempo.
- *Karaj infanoj, estu **ĉiam** honestaj!* FE.20 *Ĉiam* = en ĉiu estonta tempo.
- *La filino iris, sed **ĉiam** murmurante.* FE.19 *Ĉiam* = dum la tuta irado.

### *Neniam*

- *Bona koro **neniam** fariĝas fiera.* FA2.41 *Neniam* = neniu tempo, ĉu pasinta, ĉu estanta, ĉu estonta.
- *Tion ĉi mi **neniam** supozis.* FA1.108 *Neniam* = neniu ajn pasinta tempo.
- *La kolo de botelo **neniam** poste povis forgesi tiun solenan momenton.* FA3.108 *Neniam* = neniu tempo post tiam.
- *Li pensis pri la malgranda ĉarma dancistino, kiun li plu **neniam** vidos.* FA1.156 *Neniam* = neniu estonta tempo.

## Okazoj, kondiĉoj

AM-vortoj povas ankaŭ montri okazon aŭ kondiĉon. Tiuj du nuancoj ofte miksiĝas:

- *La artikolo “la” estas uzata **tiam, kiam** ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj.* FE.27 Montra *tiam* kaj rilata *kiam* pri okazoj.
- *Tubeto, en kiun oni metas cigaron, **kiam** oni ĝin fumas, estas cigaringo.* FE.40 Rilata *kiam* pri okazoj.
- *Se efektive estas tiel, **tiam** ni ŝin serĉu.* FA3.79 Kondiĉa *tiam*, kiu almontras la antaŭan *se*-frazon.
- *Rompu la murojn inter la popoloj,* [...] *kaj nur **tiam** povos malaperi tiaj bestaĵoj, kiujn ni nun vidas.* OV.370 *Tiam* = sub tiu kondiĉo, ke ni rompos la murojn.

Por enkonduki subfrazon, kiu montras nuran kondiĉon sen tempa aŭ okaza nuanco, oni ne uzu *kiam*, sed *se* (§33.5).

### Rolvortetoj antaŭ AM-vortoj

AM-vortoj estas ankaŭ uzataj kun tempa rolvorteto, kiu ŝanĝas la signifon:

- *Tie troviĝu almenaŭ nova freŝa funebra krepo, kiam la maljunulo fermos* ***por ĉiam*** *siajn okulojn.* [FA3.146] La esprimo *por ĉiam* montras, ke la sekvoj ĉiam restos. La fermado de la okuloj estas nur momenta, sed la sekvo, la fermiteco de la okuloj, estos eterna.
- *Mi estis maldungita en 1960.* ***De tiam*** *mi restas senlabora. De tiam* = de tiu tempo.

Kiam rolvorteto aperas antaŭ demanda *kiam*, ĝi montras la frazrolon de la vorto *kiam*:

- ***Ĝis*** *kiam, ho Eternulo, mi krios, kaj Vi ne aŭskultos* [...]*?* [Ĥb.1] *Ĝis kiam* = ĝis kiu (estonta) tempo.
- *Ŝi demandis,* ***de*** *kiam vi loĝas ĉi tie. De kiam* = de kiu (pasinta) tempo.

Sed kiam rolvorteto aperas antaŭ rilata *kiam*, ĝi ĉiam montras la rolon de la tuta subfrazo:

- ***Post*** *kiam li manĝis panon kaj trinkis, oni selis por li la azenon.* [Rĝ1.13] Post la manĝado kaj la trinkado oni selis la azenon.

Legu pli detale pri tempaj rolvortetoj antaŭ rilata *kiam* en la klarigoj pri rilataj subfrazoj en §33.4.2.

### Demandoj pri horo

Se oni demandas precize pri horo, oni ne uzas *kiam*, sed la vicordan demandvorton *kioma* (§23.8).

### Vortfarado

- *Tiama* k.t.p. = "tia, ke ĝi ekzistis (aŭ ekzistos) tiam": *Mi bone konis la* ***tiaman*** *prezidanton de la klubo.*
- *Iama* = "iam antaŭe ekzistinta, eksa". *Iama* estas uzata nur pri pasinta tempo: *Li estas* ***iama*** *fianĉo de mi. / Ili loĝas en* ***iama*** *lernejo.*
- *Ĉiama* = "ekzistanta en ĉiu tempo, en ĉiu okazo": *La boneco de Dio estas* ***ĉiama****.* [Ps.52] *Tio ĉi estas ja mia* ***ĉiama*** *deziro.* [Rt.39]
- *Porĉiama* = "tia ke ĝiaj sekvoj daŭros por ĉiam, tia ke ĝi daŭros por ĉiam": *Mi volas diri al vi* ***porĉiaman*** *adiaŭ.* [FA1.76] *Tio estas ilia* ***porĉiama*** *posedaĵo.* [Lv.25]
- *En la tago de la* ***sankta Neniamo****.* [PE.642] (= *En tago, kiu certe neniam venos.*)

### Malnovaj formoj

Komence la tempaj tabelvortoj finiĝis per AN: *kian*, *tian*, *ian*, *ĉian*, *nenian*. Zamenhof lasis unujaran periodon, dum kiu oni povis proponi ŝanĝojn en Esperanto. Post tiu jaro la sola ŝanĝo, kiu estis farita, estis ŝanĝo al AM-

vortoj pro la risko de konfuzo kun tabelvortoj je A (§15.3) + N-finaĵo. La AN-vortoj ne estas plu uzeblaj, sed oni povas ilin renkonti en tekstoj de tiu unua jaro: ***Kian** mi havos vian respondon, mi sendos al vi la libreton.* UL.21 Tio ĉi estas la sola iam okazinta reformo en Esperanto.

### 14.2.2. *Ankoraŭ*

*Ankoraŭ* montras, ke ŝanĝo ne okazis ĝis la priparolata tempo. Ofte *ankoraŭ* estas la malo de *jam*. Iafoje aliaj vortoj montras, ke estis same antaŭe, kaj *ankoraŭ* nur emfazas tion, sed ofte *ankoraŭ* estas la sola, kiu montras, ke io ne ŝanĝiĝis:

- *Vi estas **ankoraŭ** malgranda infano.* M.40 Vi ne fariĝis pli granda. Vi estis malgranda, kaj tio ne ŝanĝiĝis.
- *Ho, kiel mi lin amis! kiel mi lin **ankoraŭ** amas!* M.160 Mi ne ĉesis ami lin.
- *Ho, ĉu vi memoras **ankoraŭ** la belajn knabinojn, kiuj dancadis* [...]*?* FA1.139 Ĉu daŭras via memorado?
- *Li estas nur unufoja mensoginto dum vi estas **ankoraŭ** nun ĉiam mensoganto.* FE.22 Vi ne ĉesis mensogi.
- *La tempon venontan neniu **ankoraŭ** konas.* FE.22 Ne ĉesis tio, ke neniu ĝin konas. Ne estas jam iu, kiu konas ĝin. Nur poste, kiam la venonta tempo fariĝos estanta tempo, oni ĝin ekkonos.
- *Mi ĝin **ankoraŭ** ne serĉis.* FE.20 Ne komenciĝis la serĉado. La ne-serĉado plu daŭras. Legu ankaŭ pri la evitinda esprimo *ne jam* en §14.2.5.
- ***Ankoraŭ** antaŭ 50 jaroj inter la Japanoj kaj Eŭropanoj ekzistis ŝajne kolosa malsameco.* OV.348 Je tiu tempo ŝanĝo ne estis okazinta.

Legu pri la diferenco inter *ankoraŭ* kaj *plu*: §14.2.8.

### Aldona *ankoraŭ*

Ofte *ankoraŭ* montras, ke al jam okazinta aldono aldoniĝas plia aldono, aŭ ke okazinta kresko pludaŭras, aŭ ke io, kio ŝajnas impona, tamen ne estas la plej alta ŝtupo, aŭ ke io, kio ŝajnis esti la lasta, tamen ne estas la lasta:

- *Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas **ankoraŭ** fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj.* FE.30 Ni jam faris novajn vortojn, sed ni povas fari pliajn. Ne elĉerpiĝis la ebloj krei novajn vortojn.
- *La riĉeco de tiu ĉi homo estas granda, sed lia malsaĝeco estas **ankoraŭ** pli granda.* FE.35 La riĉeco ne estas la plej granda afero. La malsaĝeco estas pli granda. Ni ne atingis la maksimumon.
- *Ni nun **ankoraŭ** unu fojon ripetas, kion ni jam diris en alia loko.* OV.104 Al jam faritaj ripetoj aldoniĝas unu plia ripeto.
- *Ili iris **ankoraŭ** kelkan distancon.* FA1.66 Ili jam antaŭe iris kelkan distancon, kaj nun iris pli.
- *Tiu ĉi punkto estas en miaj okuloj tre grava kaj poste mi **ankoraŭ** parolos pri ĝi pli vaste.* DL.9 Al miaj antaŭaj vortoj mi aldonos pliajn.

- *Li atendis **ankoraŭ** aliajn sep tagojn.* [Gn.8] Li jam aldonis almenaŭ unu septagan periodon al sia atendado. Nun li aldonis plian septagan periodon.
- *Mi donacos al vi la tutan mondon kaj **ankoraŭ** paron da novaj glitiloj.* [FA2.74]
- *Al ni venas revizoro.* [...] *Revizoro el Peterburgo, inkognite; kaj **ankoraŭ** kun sekreta ordono.* [Rz.5] Al la du unuaj, timigaj faktoj (venas revizoro, li venas inkognite), aldoniĝas tria timiga fakto (li havas sekretan ordonon).

### 14.2.3. *Baldaŭ*

*Baldaŭ* = "post mallonga tempo":

- *Estu trankvila, mia tuta ŝuldo estos pagita al vi **baldaŭ**.* [FE.25]
- *Teatramanto ofte vizitas la teatron kaj ricevas **baldaŭ** teatrajn manierojn.* [FE.37]
- *La tablo staras malrekte kaj kredeble **baldaŭ** renversiĝos.* [FE.33]
- *Kiam vi ekparolis, ni atendis aŭdi ion novan, sed **baldaŭ** ni vidis, ke ni trompiĝis.* [FE.40]
- *Mi foriras, sed atendu min, ĉar mi **baldaŭ** revenos.* [FE.42]
- *Mia trijara ofico estos **baldaŭ** finita.* [BV.53]
- *Eĉ en bona afero tro multe ofte estas malbone; pri tiu vero li **baldaŭ** devis konvinkiĝi.* [FA3.119]
- ***Baldaŭ** ni ĉiuj laboros kune, por atingi kiel eble plej **baldaŭ** nian komunan celon.* [L2.106]
- *Kiu tro alten rigardon direktas, tiu tre **baldaŭ** okulojn difektas.* [PE.427]

#### Vortfarado

- *Baldaŭa* = "tia, ke ĝi okazos aŭ okazis baldaŭ": *Knut estas en plena malespero pro mia **baldaŭa** forveturo!* [FA3.61]
- *Baldaŭe* estas pli akcenta formo de *baldaŭ*: *Estas pli bone forveturi plej **baldaŭe**.* [Rz.67]

### 14.2.4. *Hodiaŭ, hieraŭ, morgaŭ*

- *Hodiaŭ* = "en la nuna tago".
- *Hieraŭ* = "en la tago antaŭ la nuna tago".
- *Morgaŭ* = "en la tago post la nuna tago".

Iafoje oni konsideras, ke nova tago komenciĝas je noktomezo, je la nula horo, alifoje oni konsideras, ke tago komenciĝas ĉe la vekiĝo post nokta dormo. Ambaŭ rigardmanieroj estas eblaj, sed ĉe interparolo dumnokta povas ja iafoje okazi konfuzo.

- *– Kiun daton ni havas **hodiaŭ**? – **Hodiaŭ** estas la dudek sepa (tago) de Marto.* [FE.12]
- *Li estas **hodiaŭ** en kolera humoro.* [FE.31]
- ***Hodiaŭ** estas sabato, kaj **morgaŭ** estos dimanĉo.* [FE.20]

- ***Hieraŭ** mi renkontis vian filon, kaj li ĝentile salutis min.* FE.20
- ***Hieraŭ** li diris al mi la veron.* FE.24
- ***Morgaŭ** mi veturos Parizon.* FE.28
- *Neniu scias, kio **morgaŭ** lin trafos.* PE.220
- *Faru **hodiaŭ**, kion vi povas, – **morgaŭ** vi eble okazon ne trovos.* PE.942

## Verboformoj

Kun *hieraŭ* oni normale uzas IS-verbon, INT-participon aŭ IT-participon, ĉar temas ja pri pasinteco. Kun *morgaŭ* oni normale uzas OS-verbon, ONT-participon aŭ OT-participon. Sed iafoje, kiam temas pri ĉiama valida afero, oni uzas AS-formon kun *morgaŭ*: *Beleco hodiaŭ estas, **morgaŭ** ne restas.* PE.1068

Kun *hodiaŭ* oni plej ofte uzas AS-verbon, sed kiam temas pri antaŭa aŭ posta parto de la nuna tago, oni uzas IS aŭ OS:

- *Miaj fratoj havis **hodiaŭ** gastojn.* FE.18 Antaŭe hodiaŭ estis ĉe ili gastoj, sed la gastoj jam foriris.
- *La doktoredzino A. vizitis **hodiaŭ** la gedoktorojn P.* FE.36
- *Mi restos **hodiaŭ** dome.* FE.28 En la posta parto de la nuna tago mi restos dome (= hejme).

Kun ĉiuj tri vortoj ankaŭ povas aperi U-formo (§26.3) aŭ US-formo (§26.4), ĉar tiuj finaĵoj estas sentempaj.

## Absoluta signifo

*Hodiaŭ*, *hieraŭ* kaj *morgaŭ* normale rilatas al la absoluta nuno, al la tempo, kiam oni diras la tutan frazon. Por montri similajn rilatojn al pasinta aŭ estonta tago oni normale uzas *tiun tagon*, *la antaŭan tagon*, *la postan tagon* aŭ simile:

- *Marta pli atente ol **la pasintan tagon** ekzamenis per la rigardo la grandanombran anaron de siaj samlaborulinoj kaj samsortulinoj.* M.111
- *Lunde li venis viziti min, sed jam **la postan tagon*** [= marde] *li foriris.*
- ***En la venonta tago** estis venonta en la mondon mistera gasto: nova jaro.* M.115
- ***La sekvantan tagon** post sia transloĝiĝo en la mansardon Marta je la deka horo matene estis jam en la urbo.* M.18 Oni povas en ĉi tiaj frazoj heziti, ĉu devus esti *sekvanta*, *sekvinta* aŭ eĉ *sekvonta*. Zamenhof uzadis *sekvanta*. Oni povas ankaŭ diri simple *sekva*, kio forigas la problemon.

Iafoje en rakontoj oni tamen uzas *hodiaŭ*, *hieraŭ* kaj *morgaŭ* rilate al la rakonta "nuno":

- *Tiu ĉi malgranda cifero de **hodiaŭ** estis granda en komparo kun la cifero de **hieraŭ**, kiu prezentis nulon.* M.110 *= ... de la antaŭa tago ... ... de tiu ĉi tago ...*
- ***Morgaŭ** li estis forveturonta sur belega ŝipo al malproksimaj landoj.* FA3.108 *= La postan tagon li estis ...*

- *Ĝis **morgaŭ** li devis ellerni parkere ĉiujn urbojn en la provinco Zelando.* [FA2.130] *= Ĝis la posta tago li devis ...*

Legu ankaŭ pri *nun* por pasinteco en §14.2.7, pri tempaj kaj lokaj vortoj en nerekta parolo (§33.8.2) kaj pri uzo de AS-verboj por la tempo de la rakonto (§26.2.1).

La malofta vorto *ĉi-tage* (= *en tiu ĉi tago*) normale egalas al "hodiaŭ", sed estas malpli ligita al la absoluta nuno. Ĝi povas emfaze montri tiun tagon, kiun la rakontado atingis: *La antaŭa tago estis dimanĉo, kaj tiutage (en tiu tago) li estis libera, sed nun fariĝis lundo, kaj ĉi-tage (en tiu ĉi tago) li devis eklabori.*

Kunmetaĵoj kiel *pasinttage* kaj *sekvonttage* havas tre vastan signifon: *pasinttage* = "en la pasinta tago, en unu el la pasintaj tagoj, en iu pasinta tago, en iuj pasintaj tagoj".

## Figura uzo

Iafoje *hodiaŭ*, *hieraŭ* kaj *morgaŭ* estas figure uzataj pri tempoj estanta, (proksime) pasinta, kaj (proksime) venonta:

- *Kio **hieraŭ** ŝajnis sovaĝa, tio **morgaŭ** aperas kiel io tute natura kaj bela.* [OV.404] *= Kio antaŭ nelonge ŝajnis sovaĝa, tio post nelonge aperas ...* (*Aperas* havas AS-finaĵon, ĉar temas pri ĉiam valida principo.)
- ***Hodiaŭ** forto, **morgaŭ** morto.* [PE.220]
- ***Hodiaŭ** komputiloj estas uzataj preskaŭ ĉie. = En la nuna tempo ... Nuntempe ...*

Ankaŭ *nun* (§14.2.7) povas esti tiel uzata.

## Kun rolvorteto

Oni povas aldoni tempan rolvorteton, kiu modifas la signifon de *hodiaŭ*, *hieraŭ* aŭ *morgaŭ*:

- *Ĝi komencas sian ekzistadon nur **de hodiaŭ**.* [OV.111]
- ***De hieraŭ** ŝi nenion manĝis.* [Rn.44]
- *Mi havas **depost hieraŭ** alian laboristinon.* [M.183] AS-formo, ĉar la havado ankoraŭ daŭras. (Prefere oni ne skribu *depost*, sed *de post*, §12.3.2.1.)
- *Ne prokrastu **ĝis morgaŭ**, kion vi povas fari hodiaŭ.* [PE.942]

## O-vorteca uzo

*Hodiaŭ*, *hieraŭ* kaj *morgaŭ* estas iafoje O-vortece uzataj:

- *Ŝi estis soleca kiel hieraŭ, malriĉa kiel hieraŭ, sed inter **la hieraŭ kaj hodiaŭ** staris tiu prova mateno.* [M.38] *= ... inter la antaŭa tago kaj la nuna tago ...*
- *Ĉiu **morgaŭ** havas sian zorgon.* [PE.638] *= Ĉiu morgaŭo ...*
- ***Morgaŭ** estas la amata tago de mallaboruloj.* [PE.941] *= La posta tago estas ...*

## Vortfarado

- *Antaŭhieraŭ*, *postmorgaŭ* = "du tagojn antaŭ aŭ post la nuna tago": *Hieraŭ estis mardo, **antaŭhieraŭ** estis lundo. Hieraŭ estis vendredo, kaj **postmorgaŭ** estos lundo.* [FE.20] *Se tiu ĉi formo montriĝos erara, ni morgaŭ ĝin ŝanĝos, kaj en okazo de bezono ni ĝin **post-morgaŭ** ankoraŭ unu fojon ŝanĝos.* [FK.267] Estas eblaj ankaŭ *antaŭantaŭhieraŭ* (tri tagojn antaŭ la nuna) kaj *postpostmorgaŭ* (tri tagojn post la nuna), k.t.p.

  **Noto:** Estus penseble uzi la prefikson PRA (§38.3.9) en tiaj vortoj: *praantaŭhieraŭ* = *antaŭantaŭhieraŭ*, *prapraantaŭhieraŭ* = "kvar tagojn antaŭ la nuna", *prapostmorgaŭ* = *postpostmorgaŭ*, *praprapostmorgaŭ* = "kvar tagojn post la nuna".

- *Hodiaŭo*, *hieraŭo*, *morgaŭo* = "nuna, antaŭnuna aŭ postnuna tago": *Ne pensu pri la **hieraŭo**. Vivu en la **hodiaŭo**. / Kiam li vekiĝis, li rememoris la belan **hieraŭon**. / La **morgaŭo** neniam venos, ĉar kiam ĝi venos, ĝi jam estos **hodiaŭo**.*
- *Hodiaŭa*, *hieraŭa*, *morgaŭa* = 1. "apartenanta al la hodiaŭo/hieraŭo/morgaŭo": *Ĉu tio estas la **hodiaŭa** vespera gazeto?* [FA1.119] *Lia **hieraŭa** parolo estis tre bela.* [FE.40] 2. "kiu estas mem la hodiaŭo/hieraŭo/morgaŭo": *Por ĉiu tago mi ricevas kvin frankojn, sed por la **hodiaŭa** tago mi ricevis duoblan pagon.* [FE.14]

*Hieraŭo*, *hieraŭa*, *morgaŭo* kaj *morgaŭa* estas uzeblaj ankaŭ pri la antaŭa/posta tago sen rilato al la absoluta nuno: *Li memoris la **hieraŭon**.* = *... la antaŭan tagon. Ŝi timis pri la **morgaŭo**.* = *... pri la posta tago. Ili legis la **hieraŭan** gazeton.* Eble eĉ *hodiaŭo* kaj *hodiaŭa* iafoje povus esti simile uzataj.

### 14.2.5. *Jam*

*Jam* signifas, ke antaŭe okazis ia ŝanĝo, ekz. ekesto de nova ago aŭ stato, ĉeso de ago aŭ stato, atingo de certa kvanto aŭ longo, kaj simile. Ofte *jam* estas la malo de *ankoraŭ*. Iafoje io alia en la frazo montras ŝanĝon, kaj *jam* nur emfazas tion. Alifoje *jam* estas la sola, kiu montras, ke okazis ŝanĝo:

- *Mi **jam** havas mian ĉapelon; nun serĉu vi vian.* [FE.18] Antaŭe mi ne havis mian ĉapelon, sed tio ŝanĝiĝis.
- *Ĉiu jaro potence pligrandigas niajn fortojn, kaj ni iras al nia celo **jam** kun plena trankvileco.* [OV.376] Antaŭe ni ne estis plene trankvilaj.
- *Tio ĉi estis **jam** ne simpla pluvo, sed pluvego.* [FE.38] Antaŭe okazis ŝanĝo de simpla pluvo en pluvegon.
- *Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis **jam** nur varma, post du horoj ĝi estis nur iom varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis **jam** tute malvarma.* [FE.38] Post unu horo la ŝanĝo de "varmega" al "varma" estis kompleta. Post tri horoj la ŝanĝo al "tute malvarma" estis kompleta.
- *Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis **jam** longe konstruita.* [FE.25]

Iafoje *jam* akcentas, ke pasinta ago estas efektive pasinta:

- *Se li **jam** venis, petu lin al mi.* [FE.26]
- *Ĉu vi **jam** trovis vian horloĝon?* [FE.20]

- *Komencas **jam** vesperiĝi.* [M.8]

Iafoje *jam* montras, ke io estas pli frua ol oni atendas, volas, kredas, scias aŭ simile:

- *Mi **jam** antaŭ unu horo volis paroli kun Vi.* [BV.68] Vere tiel frue.
- *Vi estas ankoraŭ malgranda infano, sed vi devas **jam** kompreni tion, kion mi al vi diros.* [M.40]

Ĉe daŭrolongo aŭ ripeto *jam* emfazas, ke pasis plene tiom da tempo aŭ ripetoj:

- *Nun **jam** du jarojn daŭras la malsato en la lando.* [Gn.45] Du plenaj jaroj pasis.
- *Mi **jam** tridek jarojn estas tombisto.* [H.149] Pasis plene tridek plenaj jaroj, kaj mi ankoraŭ estas tombisto.
- *Mi laboras en la magazeno de sinjorino N. preskaŭ **jam** kvin jarojn.* [M.100] Kvin jaroj (preskaŭ) plene pasis.
- *Mi ripetis tion ĉi al vi **jam** centfoje!* Okazis efektive cent ripetoj.

Iafoje *jam* servas por fari distingon inter du IS-verboj aŭ du OS-verboj, kiuj ne montras la saman tempon. *Jam* montras la pli fruan tempon. Ofte *jam* estas helpata de la vorto *antaŭe*. Alia maniero fari tian distingon estas uzi kunmetitan verboformon:

- *Kiam vi vidis nin en la salono, li **jam** antaŭe diris al mi la veron (aŭ li estis dirinta al mi la veron).* [FE.24]
- *Kiam vi venos al mi, li **jam** antaŭe diros al mi la veron (aŭ li estos dirinta al mi la veron; aŭ antaŭ ol vi venos al mi, li diros al mi la veron).* [FE.24]

Ĉe OS-verboj *jam* povas emfazi, ke la estonta ago estas sufiĉe proksima, aŭ ke oni vidas ŝancojn, ke la ago okazos, iafoje kun nuanco de espero aŭ kuraĝigo:

- *La mondo dormas obstine, sed **jam** leviĝos baldaŭ la suno.* [FK.300] Antaŭe restis longe ĝis la sunleviĝo, sed nun ĝi baldaŭ okazos.
- *Liaj filoj, oni diras, estas iom malbonkondutaj, arogantaj knaboj, sed povas esti, ke oni estas maljustaj koncerne ilin, kaj kun la tempo ili **jam** solidiĝos.* [FA2.94] Mi havas esperojn, ke ili solidiĝos.

### *Jam ne, ne jam*

Kune kun nea verbo *jam* emfazas, ke okazinta ago ĉesis antaŭ la priparolata momento. *Jam ne = ne plu*:

- *La infano **jam ne** ploras.* [FE.6] Ĝi ĉesis plori antaŭ nun.
- *La blanka papero **jam ne** kuŝas sur la tablo.* [FE.10] Ĝi tie kuŝis antaŭe, sed ne plu.
- *Eĉ se ni volus nun halti, ni **jam ne** povus.* [OV.376] La povo ĉesis antaŭ nun.
- *Ŝi **jam** plu **ne** kuris.* [M.212] Ŝi antaŭe ĉesis kuri.

- *En la domo estas **jam nenio** por manĝi.* [M.19] Antaŭe ja estis io por manĝi en la domo.

Kune kun nea OS-verbo *jam* emfazas, ke atendata aŭ dezirata ago ne okazos:

- *Kiam mi finos mian laboron, mi serĉos mian horloĝon, sed mi timas, ke mi ĝin **jam** ne trovos.* [FE.20] La ebloj trovi estas for.
- *La tempo pasinta **jam neniam** revenos.* [FE.22]

La esprimo *ne jam*, en kiu *jam* estas neata, povas esti sencohava nur se la neo koncernas ankaŭ la ĉefverbon (aŭ alian agan vorton, al kiu rilatas *jam*). La signifo de *ne jam* + verbo principe egalas al la signifo de *ankoraŭ ne* + verbo: *Ili **ne jam** alvenis. = Ne estas tiel, ke ili jam alvenis. = Ili ankoraŭ ne alvenis.* Tio estas principe logika, sed praktike iom malfacile travidebla. Zamenhof tial prave konsilis, ke oni evitu *ne jam* uzante anstataŭe *ankoraŭ ne*, kaj plej multaj sekvas tiun konsilon.

### *Jam* por sufiĉeco

Iafoje *jam* rilatas al certa frazparto montrante, ke la afero sufiĉas, ke oni ne bezonas serĉi alian por ke la frazo estu vera:

- ***Jam** <u>la politiko</u> povus ilin devigi plenumi sian vorton.* [Rt.73] La politiko sufiĉas. Ne necesas serĉi ion alian, kio ilin devigus.
- ***Jam** <u>de vidpunkto pure historia kaj socia</u> ĝi* [= la Biblio] *devas havi grandan intereson por ĉiu homo.* [OV.51] La vidpunktoj historia kaj socia devas sufiĉi por veki intereson.
- *En ĉiu konko kuŝas brilantaj perloj, el kiuj <u>ĉiu sola</u> **jam** estus efektiva beligaĵo en la krono de reĝino.* [FA1.81] Ĉiu sola sufiĉas. Ne estas necese preni plurajn. Unu sola sufiĉas.
- *Unu amiko kiu **jam** <u>sen tio</u> multe faris por nia afero, prenis nun sur sin la tutan financan riskon de nia gazeto.* [OV.144] Liaj antaŭaj agoj sufiĉas por ke oni povu diri, ke li multe faris. Konsideri la novan agon ne estas necese.

Kiel oni povas vidi en la ekzemploj, sufiĉeca *jam* povas lokiĝi jen antaŭ, jen post la koncernata afero. Por maksimuma klareco ŝajnas bone loki ĝin antaŭe.

### Vortfarado

- *jama* = "jam ekzistanta, jam farita, jam aginta" k.s.: *Ni volas utiligi niajn **jamajn** spertojn. = ... tiujn spertojn, kiujn ni jam havas.*

## 14.2.6. *Ĵus*

*Ĵus* = "antaŭ tre mallonga tempo, antaŭ momento":

- ***Ĵus** finiĝis dudek kvin jaroj de la tempo, kiam* [...] *aperis publike la lingvo.* [OV.406] *= Antaŭ tre mallonga tempo finiĝis ...*
- *En la "Germana Esperantisto" mi legis, ke vi **ĵus** festis la 70-an datrevenon de via naskiĝo.* [OV.567]

- *Li **ĵus** starigis sian malgrandan teatron, kaj la homoj sidis ĉirkaŭe, por rigardi la komedion.* [FA1.66] *= Li antaŭ tre mallonga tempo starigis ...*
- *Ŝi meditas pri la **ĵus** aŭditaj vortoj.* [M.43]
- *Ŝi alportis al li kruĉon da akvo, kiu cetere havis strangan aldonan guston, preskaŭ kiel mara akvo kvankam ĝi **ĵus** estis alportita el puto.* [FA1.119]
- *La fruktoj por nia matenmanĝo **ĵus** estas deŝiritaj de tiuj ĉi arboj.* [BV.29]
- *De **ĵus** mi estas membro de SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda). = Mi ĵus fariĝis membro de SAT (kaj ankoraŭ estas membro).* Praktike oni tre malofte uzas *de ĵus*.

*Ĵus* ĉiam montras tempon pli fruan, pasintan, antaŭan. *Ĵus* do ĉiam aperu kun IS-verbo, INT-participo aŭ IT-participo, eventuale kun US-verbo aŭ U-verbo (kiuj estas sentempaj).

Kelkaj uzas *ĵus* en la signifo "precize en la nuna momento, precize en tiu momento". Tio estas eraro. *Ĵus* ĉiam almontras la pasintecon, momenton antaŭan. Ne diru: **Li **ĵus** venas.** Diru: *Li ĝuste nun (precize nun, ekzakte nun ...) venas.* Iuj uzas *ĵus* en la signifo "precize, ĝuste" eĉ kiam tute ne temas pri tempo. Ankaŭ tio estas eraro. *Ĵus* ĉiam estas tempa vorteto. Oni ne diru: **Mi havas **ĵus** tiom da mono, kiom mi bezonas.** Diru: *Mi havas precize (ĝuste, ekzakte ...) tiom da mono ...* Ne diru: **Li loĝas **ĵus** apud la stacidomo.** Sed: *Li loĝas tuj/ĝuste apud la stacidomo.*

En esprimoj kiel *tuj antaŭ la foriro* oni prefere uzu *tuj* (§14.2.9), ne *ĵus*, ĉar **ĵus antaŭ la foriro* = *antaŭ momento antaŭ la foriro**, kio ne estas sencohava esprimo.

Vidu ankaŭ *baldaŭ* (§14.2.3), kaj *tuj* (§14.2.9).

#### Vortfarado

- *Ĵusa* = "ĵus okazinta": *La **ĵusa** okazaĵo tre ŝokis min.*

### 14.2.7. *Nun*

*Nun* = "en tiu ĉi tempo aŭ momento, en la tempo kiam mi parolas":

- *Mi venas de la avo, kaj mi iras **nun** al la onklo.* [FE.9] *= ... mi iras en tiu ĉi parola momento ...*
- *Lia filo mortis kaj estas **nun** malviva.* [FE.31]
- *Li estas nur unufoja mensoginto dum vi estas ankoraŭ **nun** ĉiam mensoganto.* [FE.22]
- *La fera bastono, kiu kuŝis en la forno, estas **nun** brule varmega.* [FE.31]
- ***Nun** li diras al mi la veron.* [FE.24]

Ne konfuzu *nun* kun *nu* (§18.1), kiu estas ekkria vorteto kun tute alia signifo. Legu ankaŭ pri la apenaŭ uzata esprimo *ĉi tiam* ≈ *nun* en §14.1.2.

*Nun* estas normale uzata kun AS-verboj, sed ankaŭ aliaj verboformoj povas aperi:

- ***Nun** vi plu ne ricevos kisojn!* [FA2.54] = *En tiu ĉi momento kaj plu poste ...* *Nun* ĉi tie montras kaj la nunon, kaj la postan estontan tempon.
- ***Nun** mi fariĝis laca.* Temas pri la nuna rezulto de antaŭa ŝanĝiĝo.
- ***Nun** ĝi jam malaperis.* = *Nun ĝi estas for.*
- *Mi jam havas mian ĉapelon; **nun** serĉu vi vian.* [FE.18] = *... nun vi komencu vian serĉadon.*
- *Mia ora ringo ne estus **nun** tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi.* [FE.25] US-verboj ne montras tempon.

Ofte *nun* estas uzata pli ĝenerale pri la nuna epoko, la nuna mondo:

- ***Nun** komputiloj fariĝas pli kaj pli oftaj en la mondo.* Oni ankaŭ povus uzi *hodiaŭ* (§14.2.4).

Ofte *nun* montras ne nur tempon, sed ankaŭ novan situacion, novajn cirkonstancojn:

- *Mi lasis ilin tute ĉirkaŭfermi, **nun** ili devas batali kiel malesperuloj.* [Rt.67] = *... en la situacio, kiu **nun** ekestis ...*

Tio, kio kaŭzis la novan situacion, povas esti montrata per subfrazo kun rilata *kiam* aŭ kun *ke*:

- ***Nun** <u>kiam vi alvenis</u>, ni povas komenci.*
- ***Nun** <u>ke mi ricevis garantiojn</u>, mi ne plu timas.*

### *Nun* pri pasinteco

En rakontoj *nun* ofte montras tiun tempopunkton, kiun la rakonto atingis, = "en tiu momento, je tiu tempo, tiam". *Nun* donas pli vivan koloron al la rakonto ol la normala *tiam*, kvazaŭ la aŭskultanto mem ĉeestus la okazaĵojn, kvazaŭ estus nuna tempo:

- ***Nun** ŝi aliris al la skribtablo.* [M.178] = *Tiam ŝi aliris ...*
- *Ĉiuj alte ŝatis sian imperiestron, kaj **nun** li estis malsana.* [FA2.30]
- ***Nun** ĝi estis iom ripozinta.* [FA2.6]

Legu ankaŭ pri simila uzo de *hodiaŭ*, *hieraŭ* kaj *morgaŭ* en §14.2.4, kaj pri tempaj kaj lokaj vortoj en nerekta parolo en §33.8.2.

### Kun rolvorteto

Oni povas antaŭ *nun* uzi tempan rolvorteton, kiu modifas la signifon:

- *Mi sciigas, ke **de nun** la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi.* [FE.25] Temas pri la nuno kaj la tempo post la nuno.
- *Tiu reformo* [...] *eĉ per unu haro ne vanigus la laboron de tiuj, kiuj **ĝis nun** ellernis Esperanton.* [L1.180] Temas pri la tuta tempo ĝis la nuno.

Komparu kun la uzo de rolvortetoj antaŭ *hodiaŭ*, *hieraŭ*, *morgaŭ* (§14.2.4) kaj antaŭ tabelvortoj je AM (§14.2.1).

### Vortfarado

- *Nuna* = "okazanta aŭ estanta nun": *Kun la **nuna** numero finiĝas la unua jaro de eldonado de nia gazeto.* [OV.82] *La **nuna** situacio estas neeltenebla.*
- *Nun(ec)o* = "la nun estanta tempo": *Ĝi estis kontrasto inter la pasinteco kaj la **nuneco**.* [M.69] *Ŝi ĉiam vivas en la **nuno**, ne cerbumas pri pasintaj aferoj.*
- *ĝisnuna* = "tia, ke ĝi estis/okazis/agis ... ĝis nun": *En la unua kongreso de la esperantistoj estas necese diri kelkajn vortojn pri la **ĝisnunaj** batalantoj de nia afero.* [OV.363] = *... pri tiuj batalantoj de nia afero, kiuj batalis ĝis nun.* / *Miaj **ĝisnunaj** provoj ne ampleksis ja ankoraŭ la tutan rondon da diversaj homaj laboroj.* [M.126] = *Tiuj provoj, kiujn mi ĝis nun faris, ne ampleksis ...*

## 14.2.8. *Plu*

*Plu* montras, ke ago aŭ stato ne ĉesas, sed daŭras:

- *Tenu ankaŭ **plu** ĝin en sekreto.* [H.21] = *Ne ĉesu teni ĝin en sekreto. Daŭrigu teni ĝin en sekreto.*
- *Danĝere estas lin lasi **plu** en tia libereco.* [H.113] = *Danĝere estas ne malliberigi lin.*
- *Ni ne ĉesis labori, sed **plu** faris niajn taskojn.*
- *Mi **plu** amos vin ĝis la morto.*

### Loka *plu*

Iafoje *plu* montras ne nur tempan, sed ankaŭ lokan daŭrigon:

- *Ne haltu, iru **plu**!* La irado daŭru kaj loke kaj tempe.
- *Legu **plu** kelkajn ĉapitrojn, kaj vi komprenos ĉion.* La legado daŭru tempe kaj al posta loko en la libro.

### Neata *plu*

Se oni aldonas neon al *plu*, oni esprimas, ke la ago aŭ stato ne daŭras:

- *En la sekvanta tago oni <u>ne</u> **plu** parolis pri la okazintaĵo.* [FA3.50] Oni ĉesis paroli pri la okazintaĵo.
- *Kiam ni ilin revidos, ni <u>ne</u> **plu** rekonos ilin.* [OV.400] La rekonado ĉesos.
- *Ĝis ĉi tie aliru, sed <u>ne</u> **plu**.* [Ij.38]
- *Mi <u>ne</u> povas **plu** instrui vian filinon, sinjorino.* [M.57]
- *Mi havas <u>nenion</u> **plu** por doni!* [FA3.3]
- *Ĉiu el tiuj ĉi laŭtaj projektoj restis nur projekto kaj faris <u>nenian</u> paŝon **plu**.* [OV.423]

Zamenhof tre ofte uzis *plu ne*, kiam laŭsence devus esti *ne plu*: *Mi lin antaŭe amis, sed nun lin **plu** <u>ne</u> amas.* [BV.86] La celita senco estas ... *lin <u>ne</u> **plu** amas*. Logike *plu ne amas* devas signifi, ke oni jam antaŭe ne amis, kaj ke la ne-amado plu daŭras. En la zamenhofa traduko de la *Malnova Testamento*, li

multloke origine skribis *plu ne*, kvankam la senco estis *ne plu*. Feliĉe li mem aŭ la redaktintoj sisteme korektis tion al *ne plu*.

### *Plu* kaj *ankoraŭ*

*Plu* kaj *ankoraŭ* (§14.2.2) povas ofte esti tre similaj. La diferenco estas, ke *ankoraŭ* almontras la pasintecon, dirante, ke tio, kio antaŭe estis, ne ŝanĝiĝis, dum *plu* almontras la estontecon, informante, ke tio, kio estas nun, estos ankaŭ poste.

*Ankoraŭ* povas ankaŭ montri, ke io ripetiĝos, ke aldoniĝos io nova samspeca, dum *plu* signifas, ke io daŭros senŝanĝe: *Poste mi **ankoraŭ** parolos pri ĝi pli vaste.* [DL.9] Al miaj antaŭaj vortoj mi aldonos pliajn. *Mi nun ĉesas kanti por fari paŭzon. Poste mi **plu** kantos.* Mia kantado daŭros poste.

### *Plu* kaj *pli*

*Plu* kaj *pli* (§14.3.15) povas iafoje esti similaj, sed baze estas granda diferenco. *Plu* estas tempa (kaj loka) vorteto. *Pli* montras gradon, komparon. *Pli* povas montri tempon nur se alia tempa vorto ĉeestas aŭ estas subkomprenata:

- *Li rakontis **plu**. = Li daŭrigis sian rakontadon.*
- *Li rakontis **pli**. = Li rakontis pli multe da aferoj.*
- *Li ne vivos **plu**. = Li ne vivos **pli longe**.*
- *Mi pensas, ke ĝi estos konstruata **pli*** [longe] *ol tri jarojn.* [FE.25] Ĉi tie oni ne uzu *plu*, ĉar sekvas *ol*-esprimo (§20.1), kiu postulas *pli* aŭ similan vorton.

### Vortfarado

- *Plua* = "daŭronta aŭ daŭrinta plu, okazonta aŭ okazinta en posta tempo": *Kaj kia estas la **plua** sorto de la filino, kiu lin forlasis?* [BV.83] *Kelke da feliĉaj ideoj* [...] *kuraĝigis min por **plua** laborado.* [FK.231] *Tiu elektra frapo en la koron malebligas al ni por ĉiam la **pluan** uzadon de nia korpo.* [FA1.126]
- *Plue* estas sufiĉe ofte uzata akcenta formo de *plu*: *Aŭskultu min **plue**.* [M.158] *Kiel ĝis nun, tiel ankaŭ **plue**, ni, esperantistoj, iros trankvile nian vojon.* [OV.448] *La bela muziko ludis ĉiam **plue**.* [FA1.34]

*Plue* estas uzata ankaŭ en direkta signifo. Por klareco oni tiam ofte aldonas direktan N-finaĵon → *pluen*:

- *Kelke da paŝoj **plue** troviĝas la tomba monumento de Alfieri.* [FA1.215]
- *La ŝipeto veturis **pluen**.* [FA1.156]
- *Poste li en bona humoro kaj kun kontenta spirito iris **pluen** tra la granda arbaro.* [FA1.63]
- *La kofro ekflugis kun li tra la kamentubo tre alten, super la nubojn, **pluen**, ĉiam **pluen**.* [FA1.197]
- *Li rakontis pri siaj malliberuloj kaj precipe pri unu, kiu eldiris nepripensitajn vortojn, kiuj poste estis rakontitaj **pluen** kaj penetris en la*

*popolon.* [FA3.135] Ĉi tie nur la N-finaĵo montras, ke temas (ankaŭ) pri loka moviĝo. La vortoj per rakontado moviĝis al pli kaj pli multaj lokoj kaj homoj.

Ĉi tia direkta N-finaĵo ne estas tute logika, ĉar *plu* ne montras la celon de la moviĝo. Tamen la signifo estas tute klara. Kiam *pluen* helpas al klareco, oni ne hezitu uzi ĝin, sed ofte simpla *plu* aŭ *plue* sufiĉas. Legu pli pri tia uzo de direkta N-finaĵo en §12.2.5.

### 14.2.9. *Tuj*

*Tuj* = "sen prokrasto, sen atendo":

- *"Mi volas ke vi tien iru," diris la patrino, "kaj iru **tuj**!"* [FE.19]
- *Se li scius, ke mi estas tie ĉi, li **tuj** venus al mi.* [FE.20]
- *La fenestro longe estis nefermita; mi ĝin fermis, sed mia frato **tuj** ĝin denove malfermis.* [FE.33]
- *Li estas tre kredema: eĉ la plej nekredeblajn aferojn, kiujn rakontas al li la plej nekredindaj homoj, li **tuj** kredas.* [FE.41]
- *Kiam la suno estis **tuj** subironta, Elizo ekvidis dek unu sovaĝajn cignojn.* [FA1.164]
- *La infanoj ne **tuj** komprenis, kion ŝi diris.* [FA3.89]
- ***Tuj** post la hejto la forno estis varmega.* [FE.38]
- ***Tuj** antaŭ la vespermanĝo ni kolektiĝis en la salono.* Kelkaj uzas *ĵus* (§14.2.6) kun *antaŭ* en tiaj esprimoj, sed *tuj antaŭ* estas preferinda.

#### Loka *tuj*

*Tuj* estas ankaŭ uzata kun loka signifo = "tute proksime, tute apude". Iafoje tempa kaj loka signifoj miksiĝas:

- *Kio estas tiu granda kastelo, **tuj** apud la urbo, kun la tiel altaj fenestroj?* [FA1.198]
- ***Tuj** malantaŭ si ŝi aŭdis viran voĉon.* [M.12]
- *La monto malfermiĝis, kaj la reĝidino eniris. La vojkamarado sekvis **tuj** post ŝi.* [FA1.74] Kaj tempa kaj loka *tuj*.

#### Vortfarado

- *Tuja* = "tuj okazonta, okazinta, fariĝonta, fariĝinta" k.s.: *Li tuj faris, kion mi volis, kaj mi dankis lin por la **tuja** plenumo de mia deziro.* [FE.31]
- *Tuje* estas pli akcenta formo de *tuj*: *Li malaperis tiel **tuje**, ke neniu povis vidi kien.*

## 14.3. E-vortecaj vortetoj ceteraj

### 14.3.1. Tabelvortoj je AL

| | |
|---|---|
| ***kial*** | pro kiu kaŭzo, pro kiu motivo, pro kio |
| ***tial*** | pro tiu kaŭzo, pro tiu motivo, pro tio |
| ***ial*** | pro iu kaŭzo, pro iu motivo, pro io |
| ***ĉial*** | pro ĉiu kaŭzo, pro ĉiu motivo, pro ĉio |
| ***nenial*** | pro neniu kaŭzo, pro neniu motivo, pro nenio |

#### *Kial*

- ***Kial** vi ploras?* [M.39] = *Pro kiu kaŭzo vi ploras?* Demanda *kial*.
- ***Kial** vi ne respondas al mi?* [FE.20] = *Pro kiu motivo vi ne respondas al mi?* Demanda *kial*.
- ***Kial** ne sekvi la belon kaj ĝojon!* [FA1.194] = *Pro kiu kaŭzo mi ne sekvu la belon kaj ĝojon! Kial* estas ĉi tie demanda, sed la parolanto kvazaŭ demandas al si mem. Li ne volas respondon.
- *Ŝajnas al mi, ke mi komprenis, **kial** la viroj estas pli dezirataj, kiam la afero koncernas instruadon.* [M.32] = *... mi komprenis, pro kiu kaŭzo la viroj ... Kial* en demanda subfrazo.
- *Ne demandu **kial**.* [BV.77] *Kial* en demanda subfrazo draste mallongigita. La kunteksto montras, ke la plena frazo estas: *Ne demandu, kial vi foriru.*
- *Jen estas la kaŭzo, **kial** mi, malgraŭ mia plej granda deziro, ne povas resti en Parizo pli longan tempon.* [L1.160] Rilata *kial*. Oni povus ankaŭ diri: *... la kaŭzo, ke mi ne povas ...* La ebloj uzi *kial* kiel rilatan vorton (§33.4.2) estas tre limigitaj.
- *Ŝia patrino insultis ŝin, **kial** ŝi revenis tiel malfrue de la fonto.* [FE.17] = *Ŝia patrino insultis ŝin (demandante): "**Kial** vi revenis tiel malfrue de la fonto?"* La *kial*-frazo montras la motivon, ke la patrino insultis, sed samtempe ĝi estas demando. *Kial* estas ĉi tie do ia mikso de demanda *kial* kaj *ĉar* (§33.6). Temas pri formo de nerekta parolo (§33.8).

#### *Tial*

- <u>*Aleksandro ne volas lerni*</u>*, kaj **tial** mi batas Aleksandron.* [FE.9] = *... kaj pro tiu kaŭzo mi batas Aleksandron. Tial* reprezentas la antaŭan frazon.
- <u>*Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn*</u>*; **tial**, se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj, mi finos la tutan libron en kvar tagoj.* [FE.14]
- <u>*Hodiaŭ estas bela frosta vetero*</u>*, **tial** mi prenos miajn glitilojn kaj iros gliti.* [FE.34]
- <u>*En la kota vetero mia vesto forte malpuriĝis*</u>*; **tial** mi prenis broson kaj purigis la veston.* [FE.39]
- *Ĉiuj ŝatis Esperanton ne **tial**,* <u>*ke ĝi alproksimigas reciproke la korpojn de la homoj*</u>*, eĉ ne **tial**,* <u>*ke ĝi alproksimigas la cerbojn de la homoj*</u>*, sed*

*nur **tial**, ke ĝi alproksimiĝas iliajn korojn.* OV.373 Ĉiu el la tri *tial* reprezentas postan *ke*-frazon.

Rimarku la diferencon inter *tial* kaj *ĉar* (§33.6). *Ĉar* enkondukas subfrazon, kiu montras kaŭzon. *Tial* reprezentas kaŭzon. Anstataŭ *ĉar* oni povas uzi *tial ke*: *Ŝi estas bela. **Tial** mi amas ŝin. = Mi amas ŝin **tial**, ke ŝi estas bela. = Mi amas ŝin pro tio, ke ŝi estas bela. = Mi amas ŝin, ĉar ŝi estas bela.* Sed iafoje oni uzas *tial* kaj *ĉar* samtempe por plia klareco.

### *Ial*

- *La mondo **ial** rigardas ilin senkonfide.* M.1 *= La mondo pro iu kaŭzo rigardas ...*
- *Mi provis esti kudristino, sed mi **ial** ne sukcesis!* M.145
- *Mi vin **ial** ankoraŭ ne konas.* M.11

### *Ĉial*

- *Vi demandas, kial mi amas vin. Mi respondas: **ĉial**! = ... pro ĉiuj kaŭzoj!* En la praktiko *ĉial* estas apenaŭ uzata.

### *Nenial*

- *Vi povus inciti lin kiom ajn. Li **nenial** kolerus. = ... li pro neniu kaŭzo kolerus.*

*Nenial* estas en la praktiko tre malmulte uzata.

Oni diskutis, ĉu estas eble uzi *nenial* kun la signifo "senkaŭze". Tiam ĝi ne havus nean efikon sur la verbo: *Ŝi ridis **nenial**. = Ŝi ridis senkaŭze.* (Ŝi ja ridis, sed sen motivo.) Ekzistas tamen Fundamenta regulo, ke NENI-vortoj neas la verbon (§21). Nenial oni faru escepton por *nenial*. La frazo *Ŝi ridis **nenial*** povas do nur signifi, ke ŝi ne ridis (kia ajn estus la kialo por ridi). Uzu je bezono *sen kaŭzo*, *senkaŭze*, *senmotive* aŭ simile por la alia senco: *Li batis min **senkaŭze**.* (Li ja batis min.) ***Nenial** li batos vin.* (Li ne batos vin.)

### Vortfarado

- *Kialo* = "kaŭzo, motivo": *Mi ne komprenas la **kialon** de tio.* La vorto *kialo* ne estas bazita sur demanda *kial*, sed sur la **rilata** uzo de *kial* (§33.4.2): *la kaŭzo, kial mi agis tiel → la kialo de mia agado*.

  **Noto:** Iuj opinias, ke *kialo* estas mallogika vorto, ĉar ne temas pri demando. Ili ne komprenis, ke *kialo* estas bazita sur la rilata signifo de *kial*. Anstataŭe iuj el ili uzas **tialo**. Sed *kialo* vere estas tute logika vorto. Oni povas simile formi ekz. *kieo* (la loko, kie io estas), *kielo* (la maniero, kiel oni ion faras) k.s.

## 14.3.2. Tabelvortoj je EL

| | |
|---|---|
| ***kiel*** | en kiu maniero aŭ grado |
| ***tiel*** | en tiu maniero aŭ grado |
| ***iel*** | en iu maniero aŭ grado |
| ***ĉiel*** | en ĉiu maniero |
| ***neniel*** | en neniu maniero |

La EL-vortoj estas ĝeneralaj E-vortecaj tabelvortoj, kiujn oni uzas, se ne temas pri tempo/okazo (AM-vortoj §14.2.1), loko (E-vortoj §14.1.1), kaŭzo (AL-vortoj §14.3.1) aŭ kvanto/nombro (OM-vortoj §14.3.3). La EL-vortoj sekve kovras pli-malpli ĉiujn aliajn signifojn, kiujn povas esprimi E-vorto. Grado kaj maniero estas la plej gravaj signifoj de la EL-vortoj, sed ne la solaj. Ĉi-poste maniero kaj grado estos uzataj kiel klarigoj, kvankam ili ofte ne estas tute trafaj. Pli precizaj klarigmanieroj tamen ne ekzistas.

Legu ankaŭ pri grado kaj kvanto en §24.5.

### *Kiel*

- ***Kiel** vi de tie forvenis?* [Rt.61] = *En kiu maniero vi de tie forvenis?* Demanda *kiel*.
- ***Kiel** do li aspektas?* [FA1.17]
- ***Kiel** vi pensas pri ĉi tio?* [Rz.10] = *En kiu maniero vi pensas ... Kion vi pensas ...*
- ***Kiel** mi diros al la patrino, ke ankaŭ hodiaŭ mi ne ricevis ankoraŭ lecionojn!* [M.19] = *En kiu maniero mi diros ... Per kiaj vortoj mi diros ...*
- ***Kiel** estas nomata la diablo, kiu parolas el li?* [Rt.73] = *En kiu maniero ... Per kia nomo ...*
- ***Kiel** vi fartas?* [FA2.139] Ĉi tie temas ne vere pri maniero, sed pli pri grado de sanstato. *Kia estas via sanstato?*
- ***Kiel** ĝi plaĉas al via reĝa moŝto?* [Rt.72] = *En kiu maniero, kiagrade ĝi plaĉas ...*
- ***Kiel**, nur du manĝoj?* [Rz.27] = ***Kiel** povas esti, ke estas nur du manĝoj?*
- *Rakontu al mi per malmulte da vortoj, **kiel** tio okazis.* [FA2.137] = *... en kiu maniero tio okazis. Kiel* en demanda subfrazo.
- *Ĉu vi vidas tiun grandan nigran makulon sur la skribtablo de la patro? ... Mi memoras, **kiel** tio fariĝis.* [M.5]
- *Kaj **kiel** ili dancadis!* [BV.13] Ekkria *kiel*.
- *Ho **kiel** tio min malĝojigas!* [FA1.235] Ekkria *kiel*.
- *Mi zorgas pri ŝi tiel, **kiel** mi zorgas pri mi mem.* [FE.18] = *... en tiu maniero, en kiu mi zorgas ...* Rilata *kiel*.
- *Li agadis malbone antaŭ la Eternulo, tiel same **kiel** agadis liaj patroj.* [Rĝ2.23]

Iafoje *kiel* signifas pli-malpli "tion ke", sed restas ankaŭ maniera signifo:

- *Estis tre agrable rigardi, **kiel** la du knabinoj dancadis.* [BV.13] ≈ *... rigardi tion, ke la du knabinoj dancadis, kaj en kiu maniero ili dancadis.*
- *Mi aŭdis, **kiel** la kokoj krias.* [FA4.130] = *Mi aŭdis, ke la kokoj krias, kaj kiamaniere ili krias.*

Tre ofte *kiel* esprimas nur gradon, tute ne manieron:

- ***Kiel** longe ankoraŭ tiu malnova domaĉo staros ĉi tie ĉe la strato kiel spektaklo por ĉiuj?* [FA2.143] Demanda *kiel* pri grado de tempa longeco.

- ***Kiel** akurataj ili estas, tion pruvas ilia vojaĝo.* [FA2.94] *= La gradon de akurateco pruvas ilia vojaĝo.* Grada *kiel* en demanda subfrazo.
- *Tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, **kiel** granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino.* [FE.15] *= ... por vidi la gradon de ĝentileco ...*
- ***Kiel** longe ni estis en la malliberejo, tion mi ne scias.* [FA1.229]
- ***Kiel** alta estas tiu turo?*
- ***Kiel** grandan pecon vi volas?*
- *Mia Dio, **kiel** bela ĉi tio estas!* [FA2.24] Grada ekkria *kiel*.
- *Ho, **kiel** mi estas malnobla, kanajla, krima!* [M.196]
- *Mi komencis mediti pri tio, **kiel** granda, **kiel** bela kaj ruĝa ĝi estas.* [FA1.232]
- *Fi, **kiel** abomene!* [FE.26]
- *Ha, **kiel** bele!* [FE.26]
- *Vi povas aranĝi al vi feliĉon, **kiel** ajn malbela vi estas!* [FA2.37] Rilata *kiel* pri grado.

Se oni volas emfaze montri altan gradon, oni povas uzi *kiom* anstataŭ *kiel*: §14.3.3.

*Kiel* estas ankaŭ uzata por enkonduki komparajn esprimojn (§20.1). Tio estas eĉ ĝia plej ofta uzo: *Tiu ĉi malfreŝa pano estas malmola, **kiel** ŝtono.* [FE.33] *Ŝi estis soleca **kiel** hieraŭ.* [M.38]

Legu ankaŭ pri la esprimo *kiel eble plej* en §14.3.15.

En la unua tempo oni uzis *kiel se* kiel enkondukilon de subfrazo kun la signifo de *kvazaŭ* (§33.7).

### *Tiel*

*Tiel* estas plej ofte grada, sed povas ankaŭ esti maniera. Ofte la du nuancoj intermiksiĝas. Kiam *tiel* rekte priskribas A-vorton aŭ E-vorton, la nuanco estas normale nur grada. Kiam *tiel* rilatas al la ĉefverbo, ĝi estas pli ofte maniera:

- *“Se estas **tiel**,” diris la patrino, “mi devas tien sendi mian filinon”.* [FE.17] *= Se estas en tiu maniero ... Tiel* montras ion antaŭe diritan.
- *Ŝi staris **tiel** kelke da minutoj, kun senmova vizaĝo kaj teniĝo.* [M.43] *= Ŝi staris en tiu maniero ...*
- *Bojas hundido, ĉar **tiel** faras la hundo.* [PE.1086] *= ... en tiu maniero faras la hundo. ... tion faras la hundo.*
- *Tiuj fragmentoj de interparolado* [...] *faris impreson de ia, se ni povas **tiel** diri, pepado.* [M.80] *= ... se ni povas uzi la vorton “pepado”.*
- *Ne faru **tiel**, faru **tiel** ĉi!*
- *Kial vi **tiel** ploras* [...]*?* [FA2.21] *= ... en tiu maniero ..., ... tiugrade ...*
- *Mi zorgas pri ŝi **tiel**, <u>kiel mi zorgas pri mi mem</u>.* [FE.18] *= ... en tiu maniero ..., ... en tia grado aŭ amplekso ... Tiel* almontras la postan *kiel*-frazon.

- *Ili ambaŭ estis **tiel** malagrablaj kaj **tiel** fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili.* [FE.11] = *... estis tiugrade malagrablaj kaj tiugrade fieraj ...* Gradaj kaj manieraj *tiel*, kiuj almontras la postan *ke*-frazon.
- *Vi estas **tiel** bela, **tiel** bona kaj **tiel** honesta, ke mi devas fari al vi donacon.* [FE.15] Gradaj *tiel*.
- *Li estas **tiel** dika, ke li ne povas trairi tra nia mallarĝa pordo.* [FE.33] Grada *tiel*.
- *La tranĉilo estis **tiel** malakra, ke mi ne povis tranĉi per ĝi la viandon kaj mi devis uzi mian poŝan tranĉilon.* [FE.34] Grada *tiel*.
- *Ŝi fariĝis **tiel** malaminda, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de si.* [FE.23] Grada *tiel*.
- *La ĝardeno estis **tiel** grandega, ke eĉ la ĝardenisto ne sciis, kie estas ĝia fino.* [FA2.24]
- *Mi estas **tiel** forta, kiel vi.* [FE.10] Grada *tiel*, kiu almontras la postan komparan *kiel*-esprimon.
- *Eĉ naŭzas, **tiel** forte mi volas manĝi.* [Rz.26] Grada *tiel*, kiu almontras la antaŭan frazon.
- *Sur la trotuaroj de la ĉefaj stratoj de Varsovio neniam estas **tiel** multe da homoj, kiel ĝuste en tiu tempo.* [M.200] *Tiel* por grado de multeco. Kune kun *multe* oni tamen ofte uzas *tiom* (§14.3.3).
- *Mi ĝojas, ke vi **tiel** baldaŭ venis.* [FK.101]
- *Mia ora ringo ne estus nun **tiel** longe serĉata, se ĝi ne estus **tiel** lerte kaŝita de vi.* [FE.25]
- *Oni **tiel** malhelpis al mi, ke mi malbonigis mian tutan laboron.* [FE.33]
- *Kio vin **tiel** afliktas?* [M.55]

Se oni volas emfaze montri altan gradon, oni povas uzi *tiom* anstataŭ *tiel*: §14.3.3.

Iafoje kiam ĉeestas rilata *kiel*-subfrazo, *tiel* povas esti forlasata: §33.4.3.

### *Iel*

*Iel* estas sufiĉe malofte uzata. Ĝi havas normale manieran nuancon (ĉefe rilate al verbo), sed iafoje ankaŭ gradan (ĉefe rilate al A-vorto aŭ E-vorto):

- *Ĝi* [...] *sentis sin **iel** malvigla; io mankis al ĝi, sed ĝi mem ne sciis, kio al ĝi mankas.* [FA3.107] = *... en iu maniero malvigla ..., ... iagrade malvigla ...*
- ***Iel** malfacile iras la afero ĉe mia diino!* [M.50] = *En iu maniero malfacile ..., Iagrade malfacile ...*

Por grada signifo oni uzas normale *iom*, kiu tamen montras specialan nuancon: §14.3.3.

### *Ĉiel*

*Ĉiel* estas malofte uzata. Ĝi montras nur manieron:

- *Ili **ĉiel** helpis al mi.* = *Ili helpis al mi en ĉiuj manieroj.*

### Neniel

*Neniel* estas uzata ĉefe maniere. Ofte *neniel* estas uzata anstataŭ *ne* (§21) por emfazo:

- *Mi **neniel** povas kompreni, kion vi parolas.* [FE.28] = *En neniu maniero mi povas ... Mi tute ne povas ...*
- *Ni pri unu punkto **neniel** povis interkonsenti.* [OV.247] = *... en neniu maniero povis ... ... tute ne povis ...*
- *Ne, tio **neniel** devas fariĝi!* [FA1.43] = *Ne, tio absolute ne devas fariĝi!*
- *Mi **neniel** esperis sukceson.* [Rt.62] = *Mi tute ne esperis sukceson.*

### Malkiel, maltiel

Iafoje oni uzas *kiel* kaj *tiel* kun la prefikso MAL (§38.3.7). *Malkiel* ("male al, malsame de, tute alie ol") estas nuntempe relative ofta vorto, dum *maltiel* ("en la mala maniero") aperas nur tre malofte:

- *Petro volonte vojaĝas, **malkiel** Karlo, kiu preferas resti hejme.*
- ***Malkiel** en Italujo, ĉi tie tre ofte pluvas.*
- *Mi restas ĉe mia opinio, kvankam plej multaj homoj **maltiel** pensas.*

### Kiel ... tiel ankaŭ

La esprimo *kiel ... tiel ankaŭ* (iafoje simple *kiel ... tiel*) insiste montras, ke du aferoj estas same validaj. Tio tre similas al *kaj ... kaj* (§17.5):

- *Estas domaĝe, tre domaĝe, **kiel** por vi, **tiel ankaŭ** por mi.* [M.66] = *... kaj por vi, kaj por mi.*
- *La kompatinda anasido* [...] *estis mordata, puŝata kaj persekutata **kiel** de la anasoj, **tiel ankaŭ** de la kokinoj.* [FA2.37]
- ***Kiel** la koridoro, **tiel ankaŭ** la tuta ĉambro estis frotita per lardo.* [FA2.8] = *Kaj la koridoro, kaj la tuta ĉambro estis frotitaj per lardo.* Rimarku la uzon de *frotita/frotitaj*. La unua varianto estas mallongigo: *Kiel la koridoro estis **frotita** per lardo, tiel ankaŭ la tuta ĉambro estis **frotita** per lardo.* La dua ne estas mallongigo, kaj *frotitaj* priskribas du aferojn.
- *Venu Via regno, plenumiĝu Via volo, **kiel** en la ĉielo, **tiel ankaŭ** sur la tero.* (El la kristana preĝo *Patro nia*.)
- *Sama regularo estu por vi, **kiel** por la fremdulo, **tiel** por la indiĝeno.* [Nm.9]

### Vortfarado

- *Tiele* estas pli emfaza formo de *tiel* uzata nur pri manieroj: *Ho Dio, kio fariĝas en mi! **Tiele** mi ja neniam antaŭe pensis nek sentis!* [FA1.13] ***Tiele** diras la Eternulo Cebaot.* [Zĥ.1] *Tiele* sonas nuntempe iom formale aŭ solene. *Tiele* estas ankaŭ uzata en iaj tekstoj por montri, ke io stranga estas ĝuste citita: *"Li havis nenio (tiele!) por manĝi."* La vorto *tiele* ĉi tie atentigas, ke la eraro pri N-finaĵo estis jam en la originala teksto.
- *Tiela* = "tiumaniera". Uzebla anstataŭ *tia*, se temas pri maniero, aŭ por emfazo: *Mi sonĝis pri iaj du eksterordinaraj ratoj. Kredu al mi, **tielajn***

*mi neniam vidis: nigraj, de nenatura grandeco!* [Rz.5] *Tiela* estas nuntempe apenaŭ uzata.

- *Iele* estas pli akcenta formo de *iel*: ***Iele**, iome, duone malbone.* [PE.560]

Legu ankaŭ pri la kunmetaĵo *samkiel* en §20.1.5.

### 14.3.3. Tabelvortoj je OM

| | |
|---|---|
| ***kiom*** | kiel multe, kianombre, kiakvante |
| ***tiom*** | tiel multe, tianombre, tiakvante |
| ***iom*** | ne tre multe sed ankaŭ ne malmulte |
| ***ĉiom*** | la tuta kvanto |
| ***neniom*** | nenianombre, neniakvante, neniamezure |

La OM-vortoj estas uzataj kaj E-vortece (§6), kaj O-vortece (§24.4). En O-vorteca uzo OM-vorto ofte estas priskribata de *da*-esprimo (§12.3.3.1).

#### *Kiom*

- ***Kiom** mi ŝuldas al vi, sinjoro doktoro?* [FK.103] *= Kian kvanton mi ŝuldas al vi ...?* Demanda *kiom*.
- ***Kiom** vi volas, ĉu du aŭ tri? = Kiel multajn vi volas ...*
- *Mi volus scii, **kiom** de la ŝtofo ili jam pretigis!* [FA1.108] *= ... kiel multe de la ŝtofo ..., ... kian kvanton de la ŝtofo ... Kiom* en demanda subfrazo.
- *Ŝi pripensis, **kiom** kostos al ŝi la nokta restado.* [FA4.115] *= ... kiel multe kostos ..., ... kian kvanton kostos ...*
- *Ĉu vi ne scias, Schufterle, **kiom** estis da mortigitoj?* [Rt.64] *= ... kiel multe/kia nombro/kia kvanto da mortigitoj estis?*
- ***Kiom** da homoj estas ĉi tie!* Ekkria *kiom*.
- *Ĉiuj donas al mi prunte, **kiom** mi volas.* [Rz.93] Rilata *kiom*.

#### *Tiom*

- *Sendi <u>100 ekzemplerojn</u> mi ne povis, ĉar mi nun **tiom** ne havas.* [OV.518] *Tiom* montras la antaŭe diritan nombron.
- *Malfermu la keston kaj prenu **tiom** da mono, <u>kiom vi volas</u>.* [FA1.6] *Tiom* almontras la postan *kiom*-frazon.
- *Ekzistis nenio krom* [...] *du ĉemizetoj kaj malnovaj infanaj vestetoj, por kiuj neniu donos eĉ **tiom**, <u>kiom oni devas pagi por fasko da ligno</u>.* [M.197] *Tiom* almontras la postan *kiom*-frazon.
- *Li havis tiun ĉi matenon kun la preparado al la forveturo **tiom** da laboro, <u>ke li jam tuj post la leviĝo de l' suno sin levis kaj eliris</u>.* [BV.22] *Tiom* almontras la postan *ke*-frazon, kiu esprimas la kvanton nerekte per ĝiaj sekvoj.
- *Pri **tiom** da feliĉo mi eĉ ne sonĝis, kiam mi estis ankoraŭ la malbela anasido!* [FA2.42] *Tiom* almontras la feliĉoplenan situacion.

Iafoje kiam ĉeestas rilata *kiom*-subfrazo, *tiom* povas esti forlasata: §33.4.3.

### Iom

Teorie *iom* devus signifi "ia nedifinita kvanto", sed en la praktiko ĝi preskaŭ ĉiam montras malgrandan kvanton. La signifo estas efektive eĉ pli speciala, nome: "ne tre multe, sed tamen sufiĉe multe por esti konsiderata, por esti signifa". *Iom* estas uzata ne nur pri kvanto aŭ nombro, sed ankaŭ pri grado, ĉiam kun sia speciala nuanco:

- *La juna vidvino* [...] *aĉetis **iom** da butero.* [M.64] = *... kvanton da butero ne tre grandan sed tamen konsiderindan.*
- *Mi pensas, ke mi ĝin ankoraŭ **iom** memoras.* [BV.53] = *... ne tre multe memoras, sed ankoraŭ ja memoras.*
- *Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi tamen komprenis **iom** vian leteron.* [FE.34]
- *Ŝajnas al mi, ke tiu ĉi ĉambro estas **iom** malseka?* [Rz.33] = *... ne tre malseka, sed sufiĉe malseka por ke tio estu rimarkita?* Grada *iom*.
- *Tuj post la hejto la forno estis varmega, post unu horo ĝi estis jam nur varma, post du horoj ĝi estis nur **iom** varmeta, kaj post tri horoj ĝi estis jam tute malvarma.* [FE.38] Grada *iom*.
- *Tie supre estingiĝis la ruĝaj koloroj, dum la suno **iom** post **iom** malaperis.* [FA2.90] La esprimo *iom post iom* montras, ke io okazas per multaj malgrandaj apenaŭ distingeblaj ŝanĝiĝetoj.

Ne konfuzu *iom* kun *malmulte*:

- *Li faris **iom** da eraroj.* Estis ne tre multe da eraroj, sed tamen sufiĉe por ke oni mallaŭdu lin.
- *Li faris **malmulte** da eraroj.* La eraroj estis tiel malmultaj, ke oni devas laŭdi lin.

Trian subtilan nuancon havas *kelke* = "ne tre multe". Dum *iom* esprimas, ke nedifinita kvanto, kvankam malgranda, tamen estas konsiderinda, *kelke* montras, ke nedifinita kvanto, kvankam ne nula, tamen ne estas tre granda:

- *Sur la ŝoseo estis **iom** da aŭtoj.* La aŭtoj estis malmultaj, sed ne neglekteble malmultaj.
- *Sur la ŝoseo estis **kelke** da aŭtoj.* La aŭtoj estis pli ol unu, sed ne tre multaj. Nuntempe oni pli ofte diras *kelkaj aŭtoj*. Legu pri la distingo inter *kelke*/*multe* kaj *kelkaj*/*multaj* en §24.3.

### Ĉiom

*Ĉiom* povas praktike esti uzata nur O-vortece kun la signifo "la tuta kvanto":

- *– Kiom da benzino vi volas? – Mi volas **ĉiom**, kiom vi havas.* = *... Mi volas la tutan kvanton da benzino, kiun vi havas.*

La signifo de *ĉiom* ofte praktike fariĝas tre simila al la signifo de *ĉio* (§15.2), kiun oni uzas multe pli ofte.

### *Neniom*

- *El la viando, kiun vi oferbuĉos vespere en la unua tago, **neniom** restu ĝis la mateno.* [Re.16] = *... nenia kvanto restu ĝis la mateno.*
- ***Neniom** da oro, sed bona gloro.* [PE.649]
- *Sur la mezo de la strato estas multe da radoj kaj da ĉevalaj hufoj, sed da homoj piedirantaj estas malpli, preskaŭ **neniom**.* [M.210]

*Neniom* estas uzata ankaŭ pri mezuro, kio proksimiĝas al grado:

- *Mi simpligis ĝis nekredebleco la gramatikon* [...] ***neniom** deprenante per tio ĉi de la lingvo la klarecon, precizecon kaj flekseblecon.* [FK.232]
- *Tamen tio ĉi **neniom** malhelpas.* [H.165]
- *Iliaj mensoj **neniom** diferencos de niaj.* [OV.348]

### Aldona *multe*

Ofte *kiom* kaj *tiom* estas uzataj kune kun *multe* (aŭ *multaj*). *Multe* estas forlasebla, sed ĝi iom emfazas la signifon. Oni povas ankaŭ uzi *kiel multe*, *tiel multe*, sed tiam ne estas emfazo:

- *Mi scias, **kiom multe** da malĝojo faras al Vi kelkaj intrigantoj.* [L2.60] Oni povus forigi *multe*, sed tiam malaperus iom da emfazo.
- *Ne ĉiuj esperantistoj scias, **kiom multe** nia afero ŝuldas al nia kara foririnto.* [L2.342]
- *Oni tie legas **tiom multe** pri bonfarado kaj **tiom multe** da senkulpaj versoj.* [FA3.40]
- *Tutan tagon daŭras ĉi tie la restado, **tiom multe** da tempo la multeokupita generacio dediĉas al la grandaj Anglujo kaj Skotujo.* [FA3.55]
- *Mi havas **tiom multe**, ke mi ne bezonas ŝpari!* [FA3.98]
- *Se oni konsideros,* [...] ***kiom multaj** centoj da miloj da elmigrantoj ĉiujare iras Amerikon,* [...] ***kiom multe** da germanoj vivas en Ameriko, tiam oni facile komprenos, ke la poŝta komunikiĝo estas grandega* [...]. [FK.205]
- *En la tuta mondo neniu scias **tiom multe** da historioj, kiel la dio de dormo.* [FA2.2]

### Aldona *same*

Oni iafoje aldonas *same* post *tiom* por montri, ke la kvanto estas sama kiel alia kvanto:

- *Li penis per aparta alfabeto laŭ <u>33</u> diversaj lingvoj en **tiom same** da ŝlosiloj solvi la problemon por la mondo lingvista skribadi tiel, kiel oni parolas.* [FK.248] *Tiom same* = 33.
- *Kial mia frato, se mi lin havus, povus doni lecionojn de pentrado, havante **tiom same** da talento kaj kapablo kiel mi, kaj mi ne povas?* [M.36]
- *Ĝi estis respektinda, tre klera maljuna strigo, ĝi sciis pli ol la gardisto kaj preskaŭ **tiom same** kiel mi.* [FA3.135]

### OM-vortoj kun *pli*

Tre ofte OM-vorto priskribas la vorteton *pli* (§14.3.15) precizigante ties signifon:

- *Ho, **kiom pli** bona estas via amo, ol vino!* AK.4
- *La muziko plaĉis al ni **tiom pli**, ke Alfred ĝin sendis.* BV.14
- *Ju pli da laborantoj estos, **tiom pli** rapide estos finita la granda konstruo.* FK.297 Ĉi tie *tiom* kunlaboras kun *ju*. Tiam oni normale ne uzas *tiom*, sed *des* (§17.4).

### Limiga *kiom* kaj *tiom*

Ofte *kiom*, kaj iafoje *tiom*, uziĝas por montri, ke io validas nur inter certaj limoj:

- ***Kiom** mi vidas, vi havas nur unu filon.* Rt.51 *= Laŭ tio, kion mi vidas, vi havas ...* Eble vi havas pli da filoj, sed mi ne povas vidi pli.
- *La kompatinda stana soldato tenis sin, **kiom** li povis, tute rekte.* FA1.156 *= ... tenis sin laŭpove tute rekte.* Liaj povoj teni sin rekte ne estis senlimaj.
- *La kuracado devas antaŭ ĉio turni atenton al la kaŭza momento, per konforma reguligo de la komunaj kondiĉoj de la vivo, **kiom** tion ĉi permesas la profesio de la paciento.* FK.221 La profesio povas limigi la eblojn de reguligo.
- *Ili venis en vastan koridoron sub la planko, kiu estis nur **tiom** alta, ke ili povis veturi tra ĝi en la fingringo, ne puŝiĝante per la kapo al la plafono.* FA2.7 La alteco estis limigita.
- *Mi **kiom** eble evitas tiun vorton.* L2.331 *= Mi laŭeble evitas ... Mi tiom, kiom tio estas ebla, evitas ...* Ne konfuzu la limigan *kiom eble* kun la maksimumiga *kiel eble plej* (§14.3.15).
- *Estu **tiom** feliĉa, **kiom** vi estos kompatema!* Rt.137 La feliĉo dependas de la kompatemo.

### *Kiom* kaj *tiom* pri emfaza grado

Ĉi-antaŭe estis diversaj ekzemploj de OM-vortoj por mezuro, kio estas tre simila al grado. Normale por montri gradojn oni uzas *kiel* kaj *tiel* (§14.3.2). Grado estas unu el la bazaj signifoj de *kiel* kaj *tiel*. Sed por forta emfazo, oni povas anstataŭe uzi *kiom* kaj *tiom*:

- *La propagando de Esperanto, **kiom** ajn grandaj estas ĝiaj lastaj progresoj, estas apenaŭ komencata.* L1.323
- *Se tamen, kontraŭ ĉia atendo, la kongreso estos **tiom** blindigita, ke ĝi ekdeziros ian alian lingvon, tiam* [...] *la vivo mem zorgos pri tio, ke la decido de la kongreso restu sole malviva litero.* FK.286
- *La Esperantistoj tute ne pretendas, ke ilia lingvo prezentas ion **tiom** perfektan, ke nenio pli alta jam povus ekzisti.* FK.293

Estas rekomendinde utiligi tiun ĉi eblon tre ŝpare, por ke la emfaza efekto de *tiom* kaj *kiom* ne eluziĝu, kaj por ke la distingo inter kvantaj kaj gradaj

vortoj ne fariĝu malklara. En ekz. la jena frazo Zamenhof uzis *tiel* kvankam temas pri fortega emfazo: *La lumo, kiu fluis el tie, estis* ***tiel*** *blindiga,* ***tiel*** *trapenetra, ke la animo eksaltis malantaŭen kiel de eltirita glavo.* [FA3.35]

Legu ankaŭ pri *tiom-kiom*-ismo (misuzo de *tiom* kaj *kiom* por grado, kiam tute ne temas pri emfazo): §24.5.

### Vortfarado

- *Iomete*, *iometo* = "nur malmulte, tre malgranda kvanto": *Ŝi trinkis* ***iomete*** *da vino.* / *Mi parolas* ***iomete*** *la anglan kaj la francan lingvojn.* / *Ilia ellernado por homo* ***iomete*** *klera estas afero eksterordinare facila.* [FK.234] *Ĉu via* ***iometo*** *da kuraĝo jam elvaporiĝis?* [Rt.24]
- *Iom-post-ioma* = "okazanta iom post iom": *Mi lasas al aliaj personoj kaj aliaj tempoj la* ***iom-post-ioman*** *plenan klarigadon de la homaranismo.* [OV.329]
- *Poiome*, *poioma* = "okazante/okazanta po iom (= iom post iom)": *La trajno bremsis la rapidan iron kaj* ***poiome*** *haltis.* / *Se vi volas* ***poioman*** *enkondukon en la vivon de Jesuo, tralegu la Evangelion de Marko.*
- *Kioma* = "sur kiu loko en vicordo": ***Kioma*** *horo estas, gardisto?* [FA1.127] *De la* ***kioma*** *etaĝo vi estas?* [M.11] *Li demandas min,* [...] *en la* ***kioman*** *klason mi volas lin enirigi.* [Gm.59] *Kioma* estas ofte uzata en demandoj pri horo (§23.8).
- *Tioma*, *ioma*, *ĉioma*, *nenioma* = "ampleksanta tiom/iom/ĉiom/neniom": ***Tioma*** *kvanto estis troa. Post* ***tioma*** *laboro, ili estis tre lacaj.* (= *Post tiom da laboro ...*) *Ili havis* ***ioman*** *sukceson.* (= *... iom da sukceso.*) *Ilia sukceso estis* ***ĉioma/nenioma****.* (= *... estis totala/nula.*) *Tioma* ankaŭ povas signifi "sur tiu loko en vicordo" (simile al *kioma*): *Estas nun* ***tioma*** *horo, ke vi devus enlitiĝi.* Sed tia uzo de *tioma* estas malpli ofta.

Rimarku, ke *kioma* havas vicordan signifon same kiel nombraj vortetoj kun A-finaĵo (§23.4), dum la aliaj OM-vortoj (normale) ne havas tian vicordan signifon. Teorie oni povas uzi ankaŭ *kioma* en ne-vicorda senco, sed tiam oni riskas miskomprenon.

### 14.3.4. *Ajn*

*Ajn* montras emfaze nedifinitecon aŭ indiferentecon. *Ajn* estas uzata kune kun tabelvortoj (§13.1), ĉefe kun rilataj KI-vortoj, sed ankaŭ kun I-vortoj kaj ĈI-vortoj, iafoje kun NENI-vortoj. *Ajn* ĉiam staras post la tabelvorto:

- *Mi kondukos vin al ŝi,* ***kie ajn*** *ŝi estos trovebla!* [FA3.79] Ne gravas, kie ŝi estas trovebla.
- ***Kiu ajn*** *ŝi estos, mi deziras al ŝi feliĉon!* [BV.53] Ne gravas, kiu ŝi estos.
- ***Kiel ajn*** *senbrua kaj trankvila ĝi* [= la maro] *estis, ĉiam tamen ĉe la bordo estis negranda moviĝado.* [FA1.164] Eĉ se estus tute senbrue kaj trankvile, estus tamen negranda moviĝo ĉe la bordo.
- ***Kiom ajn*** *mi petis lin, ne helpis petoj, nek minacoj.* [Gm.63]
- *Mi donis solenan promeson, ke mi silentos, ĝis mi revenos,* ***kiam ajn*** *tio ĉi fariĝos.* [BV.84]

- ***Ĉiam ajn*** *vi estas bonvena ĉe mi.* Venu, kiam vi volas.
- *Kial ŝi forlasis tiun lokon, en kiu ŝi havis* ***ian ajn*** *eblon, por* ***ion ajn*** *laborenspezi?* [M.177] Sen tiu loko tute mankas eblo.
- ***Nenion ajn*** *mi diros.* Absolute nenion.

Antaŭ *ajn* Zamenhof, pro influo de naciaj lingvoj, kelkfoje uzis rilatan KI-vorton, kiam pli logike estus uzi ĈI-vorton aŭ I-vorton. Se ne temas pri enkonduko de subfrazo, ĈI-vorto aŭ I-vorto estas preferinda. *Mi konsentas akcepti* ***kian ajn*** *pagon.* [M.66] Pli bone: ... *ĉian ajn pagon* aŭ ... *ian ajn pagon*.

**Noto:** Iafoje oni eble povus uzi *ajn* ne tuj post la tabelvorto, sed post O-vorto, kiun la tabelvorto priskribas. Tiam *ajn* fariĝus pli emfaza pro la malkutimeco de la konstruo: *Protestis neniu homo* ***ajn***. Tio estas tamen ankoraŭ apenaŭ uzata.

### Vortfarado

- *Ajna* = "ĉiu ajn, iu ajn, arbitra": *Li legus* ***ajnan*** *stultan libron.* (= *Li legus ĉiun/ĉian ajn stultan libron.*) *Prenu* ***ajnan*** *nombron.* (= *Prenu ĉiun ajn nombron.*)

## 14.3.5. *Almenaŭ*

*Almenaŭ* = "ne malpli ol (eble pli), ne malpli ofte ol, ne malpli multe ol, ne malpli longe ol", k.t.p.:

- *Lingvo arta estas* ***almenaŭ*** *50 fojojn pli facila, ol natura.* [FK.276] = ... *ne malpli ol 50 fojojn (eble eĉ pli ol 50 fojojn)...*
- *La malgranda Janjo* [...] *bezonis nepre* ***almenaŭ*** *unu fojon en tago varman manĝon.* [M.64] = ... *ne malpli ofte ol unu fojon en tago* ...
- *Mi tamen tre forte dezirus vidi la reĝidinon,* ***almenaŭ*** *por unu malgranda momento!* [FA1.9]
- *Mi devas ĉiujn* [leterojn] *tralegi kaj multajn eĉ respondi* ***almenaŭ*** *per kelkaj vortoj.* [L1.291]
- *Ib denove ekflamigis alumeton kaj trovis peceton da kandelo, kiun li ekbruligis; per tio la mizera ĉambreto* ***almenaŭ*** *iom prilumiĝis.* [FA3.94]

Oni povas ankaŭ uzi *minimume*: *Ĝi estas minimume tri metrojn longa.* Se oni montras supran limon per *maksimume* ("ne pli ol"), tiam oni uzu prefere *minimume*: *La manifestacion partoprenis minimume 2000 kaj maksimume 3000 personoj.*

**Noto:** *Minimume* = *almenaŭ*, sed oni tamen neniam uzas **malalmenaŭ** por *maksimume*.

Ofte *almenaŭ* signifas "en ĉia okazo, spite al plej malfavoraj cirkonstancoj":

- *Ĝis nun, se ŝi ofte ploris en la tago, en la nokto ŝi* ***almenaŭ*** *dormadis trankvile.* [M.176]
- *Tiam oni devas* ***almenaŭ*** *per io kovri, ekzemple per tapiŝeto.* [Rz.81]
- *Se ili ne pentos siajn malbelajn agojn, ili* ***almenaŭ*** *ĉesigos sian konstantan insultadon kaj kalumniadon.* [OV.471]
- *Tio ĉi estas stranga, sed* ***almenaŭ*** *oni ne devas tion ĉi lasi rimarki!* [FA1.109]

*Almenaŭ* estas uzebla en deziraj *se*-frazoj (§33.5) por igi la deziran signifon pli klara: *Ha, se **almenaŭ** la malgranda knabino sidus ĉi tie en la ŝipeto, tiam mi ne malĝojus, se eĉ estus duoble pli mallume!* [FA1.155]

*Almenaŭ* ofte rilatas rekte al certa frazparto montrante, ke almenaŭ ĝi validas, se ne pli. En tia uzo *almenaŭ* devas stari tuj antaŭ la frazparto, al kiu ĝi rilatas:

- *Mi **almenaŭ** <u>tion ĉi</u> scias, neniu scias tion ĉi pli bone!* [BV.83]
- ***Almenaŭ** <u>ili</u> aprobas la bazajn principojn.* Eble ankaŭ aliaj aprobas.
- *Ili aprobas **almenaŭ** <u>la bazajn principojn</u>.* Eble ankaŭ aliajn aferojn ili aprobas.

### 14.3.6. *Ankaŭ*

*Ankaŭ* montras, ke la afero ne estas sola, sed ke ĝi aldoniĝas al aliaj jam menciitaj. Normale *ankaŭ* staras ĝuste antaŭ tio, al kio ĝi rilatas:

- *La balono jam delonge malaperis, kaj baldaŭ malaperis **ankaŭ** <u>la botelo</u>.* [FA3.112] Al la jam menciita balono, oni aldonas la botelon, kiu same malaperis.
- ***Ankaŭ** <u>ŝi</u> estas nomata Amalio, kiel vi, afabla fraŭlino.* [Rt.106] Vi ne estas la sola kun tiu nomo.
- ***Ankaŭ** <u>vi</u> donu al mi vian helpon.* [Rt.38] Aliaj jam donis, nun donu vi.
- *Se vi prenis la violonon, prenu **ankaŭ** <u>la arĉon</u>.* [PE.1075]
- ***Ankaŭ** <u>al vi</u>, mia kara Hermano, li sentigos sian skurĝon.* [Rt.41]
- *Mi petas vin **ankaŭ** <u>poste</u> prunti al mi.* [FE.14]
- ***Ankaŭ** <u>hodiaŭ</u> mi ne ricevis ankoraŭ lecionojn.* [M.19]
- *La reĝo [...] eĉ ne permesis alporti al li manĝaĵon; kaj **ankaŭ** <u>dormi</u> li ne povis.* [Dn.6]
- *Li tre bele ludas violonon, kaj li **ankaŭ** <u>kantas</u> bele.*
- *Ŝia elparolado ne estis la plej perfekta, sed ĝi **ankaŭ** <u>ne prezentis iajn tro gravajn dekliniĝojn</u>.* [M.26]

#### Postmetita *ankaŭ*

La principo, ke *ankaŭ* staru rekte antaŭ tio, al kio ĝi rilatas, estas bona ĝenerala stila rekomendo, sed ĝi ne estas absoluta regulo. En la *Fundamento*, ĉe Zamenhof, kaj ankoraŭ hodiaŭ ĉe multaj esperantistoj, *ankaŭ* povas stari post la koncernata esprimo. Zamenhof ofte tiel uzis *ankaŭ*, kiam ĝi rilatis al persona pronomo, sed ankaŭ en aliaj okazoj:

- *<u>Ili</u> **ankaŭ** estas en la ĝardeno.* [FE.16] Ili estas tie aldone al aliaj personoj.
- *Sinjoro Petro kaj lia edzino tre amas miajn infanojn; <u>mi</u> **ankaŭ** tre amas iliajn (infanojn).* [FE.18] Mi amas (iliajn infanojn) aldone al tio, ke sinjoro Petro kaj lia edzino amas (miajn infanojn).
- *Ĉiu sin enmiksas, ĉiu volas montri, ke <u>li</u> **ankaŭ** estas saĝa homo.* [Rz.10]
- *Estis ankoraŭ frue matene, kiam Johano vekiĝis. <u>La vojkamarado</u> **ankaŭ** leviĝis.* [FA1.76]

Tiun ĉi eblon oni tamen ne trouzu. Se estas risko de miskompreno, oni prefere rearanĝu la frazon tiel, ke *ankaŭ* staru antaŭ la esprimo, al kiu ĝi sence rilatas: ***Ankaŭ*** *ili estas en la ĝardeno. ...* ***ankaŭ*** *mi tre amas ... ... ke* ***ankaŭ*** *li estas saĝa homo. ...* ***Ankaŭ*** *la vojkamarado leviĝis.*

Sed kiam *ankaŭ* koncernas KI-vorton, estas preskaŭ regulo, ke oni metu *ankaŭ* poste, ĉar KI-vortoj tre volas esti komence de sia frazo (§34.2.1):

- *La esperantismo, kiu predikas amon, kaj la patriotismo, kiu* ***ankaŭ*** *predikas amon, neniam povas esti malamikaj inter si.* [OV.383] Ankaŭ la patriotismo predikas amon.
- *Li staris do nun tie kun alia animo, kiu* ***ankaŭ*** *volis eniri.* [FA3.151] Ankaŭ la alia animo volis eniri.

Alie estas, se *ankaŭ* rilatas al tuta subfrazo aŭ tuta plurvorta esprimo, kiu komenciĝas per KI-vorto. Tiam oni nepre ne metu *ankaŭ* post la KI-vorto: *Li parolas* ***ankaŭ*** *kiam li manĝas. / La gramatikaj finiĝoj estas rigardataj* ***ankaŭ*** *kiel memstaraj vortoj.* [FK.241]

### Emfaza akcentado

En la parolo oni normale emfaze akcentas tiun frazparton, al kiu *ankaŭ* rilatas, se *ankaŭ* staras rekte antaŭ ĝi: ***Ankaŭ*** *mi amas vin.* Emfaza akcento je *mi*. Sed se *ankaŭ* staras post la koncernata frazparto, la emfaza akcento trafas anstataŭe *ankaŭ*: *Mi* ***ankaŭ*** *amas vin.* Emfaza akcento je *ankaŭ*. Tia ĉi akcentado tamen ne sekvas devigajn regulojn, sed dependas de la preferoj de la parolanto.

### 14.3.7. *Apenaŭ*

*Apenaŭ* montras, ke estas nur tiom, certe ne pli, eble eĉ iomete malpli. *Apenaŭ* staras kutime ĝuste antaŭ tio, al kio ĝi rilatas.

*Apenaŭ* povas rilati al kvanto aŭ mezuro:

- *La enspezo de la abona mono kovras* ***apenaŭ*** *duonon de la elspezoj.* [OV.126] La enspezoj atingas nur maksimume unu duonon de la elspezoj, certe ne pli.
- *Ili troviĝis en malproksimeco de* ***apenaŭ*** *kelke da paŝoj de la ŝtuparo de la Sanktkruca preĝejo.* [M.143] Certe ne estis pli granda distanco.
- *Ŝi aĝas* ***apenaŭ*** *dek kvin jarojn.* Ŝi havas aĝon de maksimume dek kvin jaroj, eble eĉ iomete malpli.

*Apenaŭ* povas rilati al ago. Tiam *apenaŭ* egalas al *preskaŭ ne*, kaj *apenaŭ ne* egalas al *preskaŭ*:

- *La malfeliĉa imperiestro* ***apenaŭ*** *povis spiri.* [FA2.30] Li preskaŭ ne povis spiri. Nur malfacile li spiris.
- *Ŝajnis, ke ŝi* ***apenaŭ*** *aŭdas.* [BV.86] = *Ŝajnis, ke ŝi preskaŭ ne aŭdas.*
- *La pordisto* [...] *respondis kun* ***apenaŭ*** *kaŝata malkontenteco.* [M.10]
- *"Mi pensas, ke mi ĝin ankoraŭ iom memoras",* [...] *"sed nur* ***apenaŭ***[...]. *"* [BV.53]

- ***Apenaŭ*** *<u>ne</u> falŝanceliĝis miaj piedoj, preskaŭ elglitis miaj paŝoj.* [Ps.73] *= Preskaŭ falŝanceliĝis miaj piedoj ...*

### *Apenaŭ* kaj *preskaŭ*

*Apenaŭ* kaj *preskaŭ* (§14.3.16) estas similaj, sed ne samsignifaj.

Ĉe kvantesprimoj *apenaŭ* montras, ke certe ne estas pli, dum *preskaŭ* esprimas, ke mankas iomete: *Ĝi estas* ***apenaŭ*** *<u>unu metron</u> alta.* = La alteco ne superas unu metron. *Ĝi estas* ***preskaŭ*** *<u>metron</u> alta.* = La alteco ne tute atingas unu metron.

Ĉe agoj la diferenco inter *apenaŭ* kaj *preskaŭ* estas tre granda: *Li* ***apenaŭ*** *<u>sukcesis envagoniĝi</u>.* Li ja sukcesis envagoniĝi (kvankam nur malfacile). *Li* ***preskaŭ*** *<u>sukcesis envagoniĝi</u>.* Li finfine tamen devis resti sur la kajo.

### Tempa *apenaŭ*

*Apenaŭ* povas ankaŭ esti enkondukilo de tempa subfrazo (§33.7) kun la signifo “tuj post kiam, preskaŭ samtempe kiam”.

### 14.3.8. *Do*

*Do* montras, ke la diraĵo iel estas konkludo aŭ sekvo de antaŭa afero:

- *Vi vidas **do**,*[...] *ke vi ne devas kulpigi min.* [M.90]
- *Mi finas **do** per la jenaj vortoj:* [...] [FAnt.49]
- *Ha, kia fripono li **do** estas!* [Rz.70]
- *Kartezio diris: Mi pensas, **do** mi estas.*

Pli klare konkluda estas *sekve*: *La surtuto estas aĉetita de mi,* ***sekve*** *ĝi apartenas al mi.* [FE.25]

*Do* estas ankaŭ uzata kiel emfaza vorto en demandoj kaj ordonoj. Iafoje la konkluda signifo restas, alifoje la nuanco estas nur emfaza:

- *Kio **do** fariĝis kun la gesinjoroj?* [FA3.31]
- *Kio! vi ne sciis **do** tion? de kie **do** vi venas?* [M.31]
- *Kial **do** ili manĝas kaj mi ne manĝas? Kial **do**, diablo vin prenu, mi ne povas ankaŭ? Ĉu ili ne estas tiaj samaj vojaĝantoj kiel mi?* [Rz.27]
- *Nu, venu **do** al mi post unu horo... bone?* [M.146]
- *Nu, aŭdu **do**, vi faru jenon:* [...] [Rz.18]

*PIV* kaj *PAG* proponas je bezono uzi *do* por montri, ke subfraza KI-vorto estas demanda, kaj ne rilata (§33.4): *Rigardu tra la fenestro, kiu* ***do*** *troviĝas tie. = ... por vidi, kiu troviĝas tie.* (Se *kiu* estus rilata, la signifo estus: *... tra la fenestro troviĝanta tie.*) Tio povas ofte funkcii, sed ankaŭ konkluda *do* povas iafoje aperi ĉe rilata KI-vorto, ekz.: *Li scias nur la anglan lingvon. Lian demandon, kiu* ***do*** *estos farata en la angla, mi poste interpretos en Esperanton.* Malgraŭ *do* la vorteto *kiu* estas ĉi tie rilata, ne demanda.

### 14.3.9. *Eĉ*

*Eĉ* montras, ke io estas surpriza, ke oni ne atendus, ke ĝi validas:

- *La nokto estis tiel malluma, ke ni nenion povis vidi **eĉ** antaŭ nia nazo.* [FE.33] Oni povus supozi, ke almenaŭ antaŭ la nazo oni ion vidus, sed ne.
- *Timulo timas **eĉ** sian propran ombron.* [FE.37] Estas surprize, ke li timas sian propran ombron, sed tiel ja estas.
- *Li estas tre kredema: **eĉ** la plej nekredeblajn aferojn, kiujn rakontas al li la plej nekredindaj homoj, li tuj kredas.* [FE.41] Oni supozus, ke almenaŭ tiajn aferojn li ne kredus.
- *Li estas tre purema, kaj **eĉ** unu polveron vi ne trovos sur lia vesto.* [FE.41]
- *Per unueco ni pli aŭ malpli frue nepre venkos, **eĉ** se la tuta mondo batalus kontraŭ ni.* [OV.410]

#### La pozicio de *eĉ*

*Eĉ* staru ĉiam ĝuste antaŭ tio, kion ĝi koncernas. Vidu ekzemplojn ĉi-antaŭe. Sed, kiam *eĉ* rilatas al subfrazo kun *se*, Zamenhof ofte metis *eĉ* post *se*, verŝajne por bonsoneco. Tio estas iom mallogika, sed ĉar miskompreno praktike ne povas okazi, ne necesas kondamni tian uzadon:

- *La fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se **eĉ** ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto estas sendube erara.* [FAnt.47]

### 14.3.10. *Ja*

*Ja* estas emfaza vorto, kiu insistas pri la vereco de la diraĵo:

- *Vi **ja** aŭdis per oreloj propraj.* [H.133]
- *Morti iam vi **ja** devas.* [FA2.136]
- *Ankoraŭ hodiaŭ en la nokto povas **ja** fali hajlo kaj ĉion forbati.* [Rt.80]
- *Lia sento de aŭdado estis tro forta, li aŭdis **ja**, kiel la herbo kreskas.* [FA3.119]
- *En la mondo ekzistas **ja** Dio.* [Gm.51]

En pozitivaj frazoj *ja* estas la malo de *ne*. Ĝi emfazas, ke la frazo estas pozitiva. Sed *ja* povas ankaŭ esti uzata kune kun nea vorto. Tiam *ja* akcentas la neadon:

- *La floroj **ja ne** povoscias paroli!* [FA1.32]
- *Mi havis de post la musa reĝo la dudek-unuan lokon, kaj tio estas **ja ne** malgranda honoro!* [FA3.126]

Ne konfuzu *ja* kun *jes* (§22.4), kiu estas pozitiva respondvorto. Iafoje oni emfaze respondas per *Jes **ja**!* (§22.4) Tiam *ja* rilatas al subkomprenata ĉef-verbo, ekz.: *Jes, tiel **ja** estas.*

### 14.3.11. *Jen*

*Jen* servas por altiri la atenton al io, por prezenti ion, = "rigardu ĉi tion!, rigardu ĉi tie!, atentu ĉi tion!, aŭskultu ĉi tion!" kaj simile:

- ***Jen** la suno subiras, venas la nokto.* [FA2.89] = *Vidu! La suno subiras ...*
- *Krak'! **jen** ĝi falis de la ŝranko, kuŝis sur la planko en mil pecetoj.* [FA3.86]
- ***Jen** la akvo iris jam super la kapon de la soldato.* [FA1.156]
- *Unu vesperon li sidas en sia ĉambro, kaj **jen** subite oni frapas tre mallaŭte je la pordo.* [FA2.136]
- *Vi ne bezonas rigardi ilin. Vi havas ekzemplojn aliajn – antaŭ vi estas via patrino. **Jen** tiajn ekzemplojn vi devas sekvi.* [Rz.77]
- *Post du jaroj Faraono havis sonĝon, ke **jen** li staras apud la Rivero.* [Gn.41]

Ofte *jen* anstataŭas *ĉi tie*, iafoje ĝi anstataŭas *tio*, *tiu*, *tiam* aŭ simila esprimo, ĉiam aldonante sian atentigan nuancon:

- ***Jen** estas pomo.* [FE.6]
- ***Jen** estas la pomo, kiun mi trovis.* [FE.6]
- ***Jen** kuŝas la ĉapelo de la patro.* [FE.8]
- *Vidu, **jen** estas la pantalono! **jen** estas la surtuto! **jen** la mantelo!* [FA1.110] = *... ĉi tie estas la mantelo.* Tre ofte oni subkomprenas *estas* aŭ *troviĝas* en frazoj kun *jen*.
- *"Sed **jen** estas ankaŭ, kaj **jen** estas denove!" ili ĉiuj ekkriis; kien ajn ili rigardis, troviĝis krucoj sur la pordoj.* [FA1.11]
- *Beleco, mildeco, modesteco, obeeco kaj pieco, **jen** estas la virtoj, kiuj konvenas al virino.* [M.139] *Jen* = *ĉi tiuj* + atentigo.
- ***Jen** kion diris Aĥitofel.* [Sm2.17] = ***Jen** (estas) tio, kion diris Aĥitofel!*
- ***Jen** venis la aŭtuno.* [FA1.209] = ***Jen** tiam venis la aŭtuno.*

*Jen ... jen* havas specialan signifon: §17.3.

#### Vortfarado

- *Jene* = "ĉi tiel kiel mi jen montros": *La demando, kiun ni metis, devas esti respondita **jene**:* [...] [OV.108]
- *Jena* = "tiu ĉi kiu jen sekvas, tiu ĉi kiun mi jen donas aŭ montras": *Mi finas **do** per la jenaj vortoj:* [...] [FAnt.49] *Mi havas la intencon prezenti al la Akademio projekton de regularo pri la tri **jenaj** punktoj:* [...] [L2.212]
- *Jeno* = "tio ĉi kio jen sekvas, tio ĉi kion mi jen donas aŭ montras": *Por solvi la taskon vi bezonas la **jenon**: paperon, du krajonojn kaj abundan tempon. / Al via demando mi povas respondi **jenon**:* [...] [OV.559]

Oni iafoje hezitas, ĉu uzi *la* antaŭ *jena* kaj *jeno*. Ili similas laŭ la signifo al tabelvortoj je TI, antaŭ kiuj oni neniam uzas *la*, sed *jena* kaj *jeno* estas ordinaraj A-vorto kaj O-vorto, kaj do devus akcepti *la*. En la ĉi-antaŭaj ekzemploj *la* iafoje aperas, alifoje ne. En la praktiko tio ne gravas. Oni povas agi laŭplaĉe.

*Jene*, *jena* kaj *jeno* montras ofte antaŭen al io, kio sekvos. Tabelvortoj je TI montras kutime reen al io, kio jam estas dirita: *Karlo, Elizabeto kaj Petro. **Tiuj** estas miaj amikoj.* / *Miaj amikoj estas la **jenaj**: Karlo, Elizabeto kaj Petro.* Tio tamen ne estas regulo. Vidu ĉi-antaŭe la zamenhofan ekzemplon pri beleco, mildeco k.t.p., kiu kontraŭas la kutimon.

### 14.3.12. *Kvazaŭ*

*Kvazaŭ* = "proksimume, ŝajne, iamaniere, laŭaspekte". Ĝi montras nerealecon, ŝajnon:

- *Li **kvazaŭ** volas ion komuniki nur al vi sola.* [H.29] = *Li ŝajne volas ion komuniki ...*
- *"Ĉu vi ne amas min pli ol ĉiun?" **kvazaŭ** paroladis la okuloj de la reĝidineto.* [FA1.99] Ne vere paroladis, nur ŝajnis tiel.
- *La konscio **kvazaŭ** lin forlasis.* [FA1.216] Li havis tian senton, kiu tre similis al tio, ke la konscio lin forlasis.
- *Du skerminstruistoj* [...] *renkontis sin ĉi tie **kvazaŭ** hazarde kaj kun ŝajna kolero atakis unu la alian.* [Rn.23] Ne vere estis hazarda renkontiĝo.
- *Ili vidas en mi personon, kiu **kvazaŭ** ludas la rolon de ia reĝo.* [OV.390]

*Kvazaŭ* povas esti nuancilo de O-vorta frazparto montrante, ke ĝi estu komprenata nur kiel ŝajno. Ĉi tia *kvazaŭ* staru ĝuste antaŭ tio, al kio ĝi rilatas:

- *Ha! mi eksentis **kvazaŭ** <u>pikon tra la koro</u>!* [FA2.52] Tio, kion mi eksentis, ne vere estis piko, sed ŝajnis tiel.
- *En la malaltaj tonoj de lia voĉo sonis **kvazaŭ** <u>malkontenteco</u>, mildigata de sincera kompato!* [M.135] Eble ne vera malkontenteco.
- *Ŝi retiriĝis **kvazaŭ** <u>antaŭ ia terura fantomo</u>.* [M.172] Ne vere estis fantomo antaŭ ŝi, sed ŝi agis tiel.
- *La sono de la nomo de la homo amita kaj perdita ekpikis la vundon de ŝia koro **kvazaŭ** <u>per la pinto de ponardo</u>.* [M.95] Ponardo ne vere estis uzata.

#### *Preskaŭ* kaj *kvazaŭ*

Ne konfuzu *kvazaŭ* kun *preskaŭ* (§14.3.16). *Kvazaŭ* montras nerealecon, ke io ŝajnas ia, kvankam ĝi vere estas (tute) alia. *Preskaŭ* montras nesufiĉecon (malgravan), ke io estas ja tiaspeca, sed ke mankas iomete: *Li estis **kvazaŭ** pikita per ponardo.* Ŝajnis kiel ponardopiko, sed tute ne estis. *Li estis **preskaŭ** pikita per ponardo.* La ponardopiko maltrafis lin.

#### Enkondukilo de subfrazo

*Kvazaŭ* ankaŭ estas enkondukilo de subfrazo (§33.7): *En la ventro estas tia krakado, **kvazaŭ tuta regimento ekblovus trumpetojn**.* [Rz.21] *Ni ŝajnigu, **kvazaŭ ni tute ne scias, kia homo li estas**.* [Rz.32]

### Komparilo

*Kvazaŭ* povas ankaŭ enkonduki komparajn esprimojn (§20.2) simile al *kiel*: *La varmo de la ĉambro kaj la delikata bonodoro de la floroj ebriigis ŝin* ***kvazaŭ drinkaĵo****.* [M.148]

### *Kiel se*

En la plej unua tempo *kvazaŭ* ankoraŭ ne ekzistis. Tiam oni anstataŭe uzis *kiel se* aŭ nur *kiel*, sed nur por enkonduki subfrazojn: §33.7.

## 14.3.13. *Mem*

### Identeca *mem*

Identeca *mem* staras post vorto, kaj montras, ke oni parolas ĝuste pri tiu afero, ne pri alia. *Mem* atentigas pri la identeco de la afero. Identeca *mem* plej ofte staras post personaj pronomoj, sed ankaŭ post aliaj O-vortecaj vortetoj, post difinitaj O-vortoj aŭ post propraj nomoj:

- *Mi longe interne batalis kun mi* ***mem****.* [L2.186] Mi ne batalis kun alia persono (aŭ aliaj personoj), sed kun mi. La aldona *mem* emfazas tion.
- *Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, ol sin* ***mem****.* [FE.18]
- *Mi zorgas pri ŝi tiel, kiel mi zorgas pri mi* ***mem****; sed ŝi* ***mem*** *tute ne zorgas pri si kaj tute sin ne gardas.* [FE.18]
- *Mi kredeble ne povos veni al vi hodiaŭ, ĉar mi pensas, ke mi* ***mem*** *havos hodiaŭ gastojn.* [FE.41]
- *Mi eĉ* ***mem*** *jam de longa tempo uzas ilin de tempo al tempo.* [LR.100B] *Mem* rilatas al *mi*, kaj *eĉ* emfazas *mem*.
- *Kiu kritikas kuraĝe,* [tiu] ***mem*** *agas malsaĝe.* [PE.252] *Mem* rilatas al subkomprenata *tiu*.
- *Fizikiston oni ne povas nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco* ***mem****.* [FE.32]
- *Ili ne forgesu, ke tio ĉi estus danĝera por la afero* ***mem****.* [DL.12]
- *La knabo staris respektege, kvazaŭ li staris antaŭ la reĝo* ***mem****.* [FA3.73]
- *En la mezo* ***mem*** *de Italujo li estis, inter Florenco kaj Romo.* [FA1.142]
- *Kiam mi furiozas, mi fariĝas kiel Satano* ***mem****.* [Rn.31]
- *Pli pene observinte la vizaĝon, oni povus veni al la konvinko, ke en la pordo staris neniu alia, ol Benjamin Britain* ***mem****.* [BV.78] *Mem* plifortigas la signifon de *neniu alia*.

### Senhelpa *mem*

*Mem* ankaŭ povas signifi "sen helpo de alia, per propra volo, sen ekstera devigo". Kun tia signifo *mem* povas lokiĝi libere en la frazo:

- *Mia opinio estas: prenu* ***mem*** *akvon, se vi volas trinki.* [FE.19] Mi ne intencas helpi vin.
- *Li* ***mem*** *foriris, li ne estis forvokita!* [FA1.145] Li iris propravole.
- *Li devis* ***mem*** *brosadi al si siajn botojn.* [FA1.8] Neniu alia faris tion por li.

- *La laboristino* [...] *foriĝis de ĉi tie* ***mem*** *kaj propravole.* [M.171] Ŝi foriĝis sen devigo kaj pro propra volo.

### Vortfarado

- *memo* = "(mensa) persono konscia pri si mem kaj pri sia propra individueco": *La animo de la individuo estas la sidejo aŭ loko de lia aŭ ŝia personeco,* ***memo*** *kaj konscio.*

*Mem* estas ofte uzata prefiksece en kunmetaĵoj kiel *memvole*, *memestimo* k.s.: §38.4.3.

## 14.3.14. *Nur*

*Nur* havas diversajn limigajn signifojn. Ĝi kutime staras ĝuste antaŭ tio, al kio ĝi rilatas.

### *Ne pli ol*

Plej ofte *nur* signifas "ne pli ol":

- *Mi havas* ***nur*** *unu buŝon, sed mi havas du orelojn.* [FE.12] = *Mi ne havas pli ol unu buŝon ...*
- *Li estas* ***nur*** *unufoja mensoginto dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto.* [FE.22]
- *En la ĉambro sidis* ***nur*** *kelke da homoj.* [FE.32]
- *Post la patro restis al ni* ***nur*** *malgranda dometo sur la strato Solna.* [M.102]

### *Ne pli longe ol*

Antaŭ tempodaŭro *nur* signifas "ne pli longe ol":

- *Ŝi staris* ***nur*** *kelke da sekundoj kaj ekkuris denove rekte antaŭen.* [M.212] = *Ŝi staris ne pli longe ol kelke da sekundoj ...*
- *Mi havis mian suspekton, sinjoro; sed* ***nur*** *de ses monatoj mi scias la veron.* [BV.84]
- *Marta hezitis dum sekundo, sed* ***nur*** *dum sekundo.* [M.182]
- *Neĝo kaŝas* ***nur*** *ĝis printempo.* [PE.833]

### *Ne pli frue ol*

Antaŭ tempopunkto *nur* signifas "ne pli frue ol, ne antaŭ":

- *Ĉu la Hetmano tion ĉi scias? –* ***Nur*** *hieraŭ li tion eksciis.* [Rt.60] = ... *Ne pli frue ol hieraŭ ... ... Ne antaŭ hieraŭ ...*
- ***Nur*** *nun ŝi eksentis, kiel forte lacigita ŝi estas.* [M.148]
- *Tiam la vastigantaro ankoraŭ ne ekzistis, ĝi komencas sian ekzistadon* ***nur*** *de hodiaŭ.* [OV.111]
- *Li vekiĝis* ***nur*** *tiam, kiam la suno leviĝis.* [FA1.62]
- ***Nur*** *post kelka pripenso kaj kvazaŭ post iom da ŝanceliĝado ŝi komencis plue paroli per iom nekuraĝa voĉo.* [M.103]
- ***Nur*** *elirinte sur la straton, ŝi forigis la rigardon de la tero kaj rapidigis siajn paŝojn.* [M.37] = *Ne pli frue ol kiam ŝi eliris sur la straton ...*

Teorie oni povus uzi *maljam* por “ne pli frue ol, ne antaŭ”, sed *maljam* ne enuziĝis. Ankaŭ aliaj proponoj por anstataŭigi *nur* en tiu ĉi signifo ne sukcesis. *Nur* estas tute bona.

### *Nenio alia ol*

*Nur* povas montri, ke ia afero estas la sola, ke neniu aŭ nenio alia rolas en ĝia rolo:

- *Via vino estas **nur** ia abomena acidaĵo.* [FE.35] Ĝi estas nenio alia. Ĝi estas nenio pli bonkvalita ol tio.
- *Esperanto estas **nur** lingvo.* [OV.371] Nenio alia ĝi estas.
- *En nia lando sin ne trovas montoj, sed **nur** montetoj.* [FE.38] Neniaj aliaj montoj ol montetoj tie troviĝas.
- *Li, kaj **nur** li, sciis la tutan veron de kelkaj jaroj.* [BV.84] Neniu alia sciis.
- *Tiam mi vidis **nur** ŝin, pensis **nur** pri ŝi.* [FA1.235] Neniun alian mi vidis, pri neniu alia mi pensis.
- *Mi venas **nur** kun mia edzino, sed sen mia frato.* [L1.172] Mi venas kun neniu alia.
- *Tage kaj nokte li **nur** lernadis kaj ripetadis!* [Gm.57] Nenion alian li faris.
- *La diablo ĝin scias, kio ĝi estas, **nur** ne rostaĵo.* [Rz.28] Ĝi povas esti ĉio ajn krom rostaĵo.
- *Fariĝis trankvile kaj mallaŭte sur la ŝipo, **nur** la direktilisto staris apud la direktilo.* [FA1.104] La direktilisto staris apud la direktilo. Nur tio okazis. *Nur* rilatas al la tuta posta frazo. Se *nur* rilatus nur al *la direktilisto*, la signifo estus, ke la direktilisto estis la sola, kiu staris apud la direktilo.
- *Mi rakontos la sekreton **nur** se vi promesas nenion diri al iu alia.* En neniu alia okazo mi rakontos. *Nur* rilatas al la tuta posta *se*-frazo.

Antaŭ tempopunkta esprimo oni normale por klareco devas uzi *sole* por la signifo “neniu alia”, ĉar *nur* tiam ordinare signifas ne pli frue ol: *Mi iris tien **sole** dimanĉe.* = Mi ne iris tien en alia(j) tago(j). *Mi iris tien **nur** dimanĉe.* = Mi iris tien ne pli frue ol dimanĉe.

### “Oni ne povus pli”

Iafoje *nur* estas uzata ĉe *povi*, *deziri*, *voli* (kaj eble aliaj similaj verboj) kun la speciala emfaza signifo “oni ne povus pli”:

- *Uzante la lastajn fortojn, mi tenis min tiel longe, kiel mi **nur** povis; sed al ĉiu ebleco estas limo, kaj nun la limo venis.* [OV.126] Mi neniel povus teni min pli longe.
- *Ili estas teksistoj kaj teksas la plej belan ŝtofon, kiun oni **nur** povas al si prezenti.* [FA1.107] Neniu povus imagi pli belan.
- *Ĉiuj ekkuris tiel rapide, kiel ili **nur** povis, por helpi al mi.* [FA3.152] Ili streĉis siajn fortojn maksimume.
- *Via sorto estos tiel feliĉa, kiel vi **nur** deziros!* [FA1.51] Ne estas eble deziri pli feliĉan sorton.

- *Ĥiram donis al Salomono lignon cedran kaj lignon cipresan, kiom li **nur** volis.* [Rĝ1.5] Li ricevis, kiom ajn li volis.

### *Nur* en deziraj subfrazoj

*Nur* estas uzebla en *se*-frazoj por esprimi deziran sencon (§33.5)

Simile *nur* iafoje aperas en deziraj memstaraj *ke*-frazoj kun nea U-moda verbo (§26.3).

### Vortfarado

- *Nura* = "nur de la montrita speco, pura": *Tio estis **nura** hazardo.* (= *Ĝi ne estis io alia ol hazardo.*) *Lia **nura** alproksimiĝo kompromitis virinon.* [M.168] (Alproksimiĝo estis sufiĉa por kompromiti.) Ne konfuzu *nura* kun *sola*, kiu signifas "ne akompanata": *Ŝi sidas hejme **sola** en sia ĉambreto.* [Rn.17] *La nombro 2 estas la **sola** para primo.*
- *Ununura* = "sola en sia speco, unika": *Tio devas esti nia **ununura** leĝo.* (Alia tiuspeca leĝo ne ekzistu.) Ne konfuzu *ununura* kun *nura*.

## 14.3.15. *Pli, plej*

Por montri gradojn de komparado oni uzas *pli* kaj *plej*, kiuj normale priskribas A-vortojn aŭ E-vortojn, sed ankaŭ aliajn vortojn. *Pli* kaj *plej* kutime staras ĝuste antaŭ tio, al kio ili rilatas.

### *Pli*

*Pli* montras, ke la priskribata eco, maniero, ago aŭ simile, superas ion alian, kun kio oni komparas:

- *La papero estas tre blanka, sed la neĝo estas **pli** <u>blanka</u>.* [FE.10] La blankeco de la neĝo superas la blankecon de la papero.
- *Lakto estas **pli** <u>nutra</u>, ol vino.* [FE.10] La nutreco de lakto superas la nutrecon de vino.
- *Mi havas **pli** <u>freŝan</u> panon, ol vi.* [FE.10] La freŝeco de mia pano superas la freŝecon de via pano.
- *Multaj birdoj flugas en la aŭtuno en **pli** <u>varmajn</u> landojn.* [FE.32] La varmeco de tiuj landoj superas la varmecon de la landoj, de kiuj ili flugas.
- *Nu, iru **pli** <u>rapide</u>!* [FE.26] Via rapideco superu la nunan rapidecon.
- *Du homoj povas **pli** <u>multe</u> fari ol unu.* [FE.12] La kvanto, kiun povas fari du homoj, superas la kvanton, kiun povas fari unu homo.
- *Mia frato diris al Stefano, ke li <u>amas</u> lin **pli**, ol sin mem.* [FE.18] La frato amas kaj Stefanon, kaj sin mem, sed lia amo al Stefano superas lian memamon.
- *Se vi scius, kiu li estas, vi lin **pli** <u>estimus</u>.* [FE.26] La estimo tiam superus la nunan estimon.

Por montri, kion *pli*-esprimo superas, oni uzas la vorteton *ol* (§20.1).

Iafoje *pli* rilatas samtempe al la ĉefverbo kaj al O-vorta frazparto montrante, ke la O-vorta frazparto validas pli ol io alia:

- *Mieno lia montris **pli** suferon, sed ne koleron.* [H.19] La mieno montris diversajn aferojn, sed suferon ĝi montris pli multe.
- *Vi ja, mi pensas, veturas **pli** pro propra plezuro?* [Rz.32] Estis diversaj motivoj de veturado, sed propra plezuro estis pli influa ol la aliaj.

Legu pri la diferenco inter *pli* kaj *plu* en §14.2.8.

### *Plej*

*Plej* montras, ke la priskribata eco, maniero, ago aŭ simile, superas ĉiujn aliajn, kun kiuj oni komparas. Povas esti ĉiuj aliaj, kiuj ekzistas, aŭ ĉiuj aliaj ene de la kunteksto:

- *Aŭgusto estas mia **plej** amata filo.* [FE.22] Ne ekzistas filo, kiun mi amas pli.
- *Ŝi prenis la **plej** belan arĝentan vazon, kiu estis en la loĝejo.* [FE.19] Pli bela vazo tie ne ekzistis.
- *El ĉiuj miaj infanoj Ernesto estas la **plej** juna.* [FE.10]
- *Kelkaj homoj sentas sin la **plej** feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj.* [FE.32]
- *Li estas tre ekkolerema kaj ekscitiĝas ofte ĉe la **plej** malgranda bagatelo.* [FE.41]
- *Li ekaŭdis bruan tonon, kiu povis ektimigi la koron eĉ de **plej** kuraĝa viro.* [FA1.156]
- ***Plej** profunde en la koro li kaŝis sian malĝojon.* [FA3.63]
- ***Plej** bone estos, se mi prenos droŝkon!* [FA1.118]

Oni tute bone povas uzi *plej* rekte kun verbo, sed oni normale uzas *multe*, *forte* aŭ alia E-vorto, kiun *plej* priskribas:

- ***Plej** multe li amas, ke oni lin bone akceptu, ke la regalado estu bona.* [Rz.53] = *Li **plej** amas, ke ...*

Zamenhof ankaŭ uzis *pleje* en tiaj okazoj.

Por montri tiun grupon, ene de kiu validas *plej*-esprimo, oni uzas normale la rolvorteton *el* (§12.3.5.2): *Ŝi estas la plej saĝa **el ĉiuj**, kiujn mi konas.* Iuj uzadas en tiaj esprimoj *el inter* anstataŭ *el*. Tio estas peza kaj senbezona.

Oni povas ankaŭ montri, kie *plej*-esprimo validas, per *en*, *sur*, *inter* aŭ alia loka rolvorteto: *Ĝi estas la plej alta montaro **en Azio**.* [FA1.188] *Sed eĉ **inter tiuj tre malmultaj supozeblaj ŝanĝoj** la plej gravaj estas nur plibonigo ŝajna.* [OV.398]

Antaŭ *plej*-esprimoj oni ofte uzas la artikolon *la*, ĉar ordinare temas pri io unika: §9.1.5.

### *La dua plej* k.t.p.

Oni ankaŭ povas paroli pri *dua plej*, *tria plej*, *kvara plej* k.t.p.:

- *Ŝi estas la **dua plej** rapida kuranto en mia grupo.* Ekzistas nur unu, kiu kuras pli rapide ol ŝi.
- *Ateno estas mia **tria plej** ŝatata urbo en la mondo.* Ekzistas nur du urboj, kiujn mi ŝatas pli ol Atenon.
- *Jupitero estas la plej granda planedo, kaj Saturno estas **la dua plej** granda* [planedo].

En tiaj esprimoj la vicorda nombrovorto (*dua*, *tria*...) rilatas al la tuto de *plej rapida kuranto*, *plej ŝatata urbo* k.s. Oni ankaŭ povas uzi *la dua el la plej rapidaj*, *la tria el miaj plej ŝatataj*, *la due plej rapida*, *la trie plej ŝatata* k.s., sed la ĉi-antaŭaj dirmanieroj estas pli kutimaj, kaj tial pli klaraj.

### *La pli, la plej*

Kiam oni komparas ekzakte du aferojn, malaperas la diferenco inter *la pli* kaj *la plej*. Se unu afero el du estas pli granda ol la alia, ĝi estas aŭtomate ankaŭ la plej granda el ili:

- *Ĝi estas **la pli** <u>bona</u> el la du. = Ĝi estas **la plej** <u>bona</u> el la du.*

Se oni diras *la pli*, normale nur povas esti du komparataj aferoj, kaj oni ne bezonas aldoni "el la du":

- *Ŝi estas **la pli** <u>aĝa</u>. = Ŝi estas **la plej** <u>aĝa</u> el la du.*

Sed en iaj kuntekstoj ne nepre estas nur du: *Ĉu tiu estas unu el viaj malpli aĝaj fratinoj? Ne, ŝi estas **la pli** aĝa.* Ŝi estas tiu el miaj multaj fratinoj, kiu estas pli aĝa ol mi.

Multaj eĉ opinias, ke oni devas uzi *la pli*, kiam oni komparas du aferojn, kaj ke *la plej* tiam estas erara. Ĉiuokaze estas ofte pli elegante uzi *la pli*.

### *Malpli, malplej*

Por kompari oni ankaŭ povas uzi la formojn *malpli* kaj *malplej*:

- *Via pano estas **malpli** <u>freŝa</u>, ol mia.* [FE.10] ≈ *... **pli** <u>malfreŝa</u> ...*
- *Li [...] direktis al la eniranta virino rigardon **malpli** <u>serenan</u>, **malpli** <u>bonan</u> kaj <u>afablan</u> ol antaŭe.* [M.178] ≈ *... **pli** <u>malserenan</u>, **pli** <u>malbonan</u> kaj <u>malafablan</u> ...*
- *La amaso kuris **malpli** <u>rapide</u> ol la veturilo, kiu ruliĝis tre rapide.* [M.212] ≈ *... **pli** <u>malrapide</u> ...*
- *Ĝuste tie troviĝas unu loko, kiu, estante **malplej** <u>facile</u> komprenebla, **malplej** <u>bone</u> aperis en la traduko.* [M.133] ≈ *... **plej** <u>malfacile</u> ... ... **plej** <u>malbone</u> ...*
- *Tiu estas la **malplej** <u>taŭga</u> el ĉiuj.* ≈ *... **plej** <u>maltaŭga</u> ...*
- *Li estas la **malpli** <u>aĝa</u> frato* (el la du fratoj). ≈ *... la **pli** <u>juna</u> ...*

Iafoje oni povas movi la MAL-prefikson laŭplaĉe en tiaj ĉi frazoj, sed ofte estas nuanca diferenco. Iafoje estas eĉ grandega diferenco: *Li estas **malpli***

*bela ol vi. Li estas* **pli** *malbela ol vi.* La unua varianto estas komplimento. La dua estas insulto.

### *Kiel eble plej*

La esprimo *kiel eble plej* montras volon maksimumigi ion. Ĝi montras, ke oni uzu ĉiujn eblojn por atingi plej altan gradon:

- *La vortaro devis havi amplekson* ***kiel eble plej*** *<u>malgrandan</u>.* [L1.245] Ju pli malgranda, des pli bone.
- *Diru* ***kiel eble plej*** *<u>rapide</u>, per kio mi povas esti utila al vi!* [M.83] Uzu vian maksimuman rapidecon.
- *Baldaŭ ni ĉiuj laboros kune, por atingi* ***kiel eble plej*** *<u>baldaŭ</u> nian komunan celon.* [L2.106]

Zamenhof uzis ankaŭ *kiel eble pli*, sed tio estas nuntempe apenaŭ uzata: *Estas bone uzadi la vorton "je"* ***kiel eble pli*** *<u>malofte</u>.* [FE.29] Alia varianto, kiu populariĝis, estas *plejeble*: *Faru tion* ***plejeble*** *rapide!*

Atentu pri la nuancita diferenco inter *kiel eble plej* kaj la simila esprimo *kiom eble (plej/pli)*. Dum *kiel eble plej* instigas al maksimumo, *kiom eble (pli/plej)* esprimas esence la samon, sed en pli singarda maniero, emfazante, ke ekzistas gravaj limoj de la ebloj:

- *Estas dezirinde, ke ĉiuj uzu la novajn vortojn* ***kiom eble*** *egale.* [LR.54] Tute plena egaleco verŝajne ne estas ebla.
- *Mi* ***kiom eble*** *evitas tiun vorton.* [L2.331] *= Mi vere provas eviti tiun vorton, sed povas esti, ke tio ne ĉiam estas ebla.*
- *Li devas –* ***kiom*** *tio estas* ***ebla*** *– uzi lingvon* ***kiom eble plej*** *neŭtralan.* [L2.330]

Alia varianto kun limiga nuanco estas *laŭeble plej*.

### Memstara *pli* aŭ *plej*

*Pli* estas sufiĉe ofte uzata memstare:

- *Ĝi eĉ unu minuton* **pli** *ne povus elteni.* [BV.13] *Pli = pli longe*.
- *Restas ĉirkaŭ dek personoj, ne* ***pli***. [Rz.43] *Pli = pli multaj*.
- *Li ne vivos* ***pli****, ol unu tagon.* [FE.31] *Pli* montras kune kun *ol unu* la nombron de tagoj. Rimarku, ke oni uzas *tagon* en unu-nombro (§8.2.4).
- *Laŭ la projekto de la inĝenieroj tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj; sed mi pensas, ke ĝi estos konstruata* ***pli*** *ol tri jarojn.* [FE.25] La nombro superos tri. *Pli ol tri* montras la nombron de jaroj.

Iafoje ankaŭ *plej* estas uzata memstare:

- ***Plej*** *timu la homo, Se dioj lin levis!* [IT.86] *Plej = Plej multe*.

Memstara *pli* aŭ *plej* povas esti uzata O-vortece (§24.4), kiam la senco estas kvanta: *Mi volas* ***pli****! Pli* rolas kiel objekto.

Legu ankaŭ pri *pli ol* kiel nuancilo de nombro aŭ kvanto en §23.6.

## *Pli* kaj *plej* en ŝajne mallogika uzo

Ofte oni uzas esprimojn kiel *pli perfekta*, *plej perfekta*, *pli unika*, *plej unika*, *pli sola*, *plej sola* k.s. Tiaj esprimoj estas ofte kritikataj kiel mallogikaj kaj absurdaj. Oni asertas, ke vortoj kiel *perfekta* kaj *unika* montras absolutajn ecojn, kiuj ne ekzistas en pli aŭ malpli alta grado.

Baze *perfekta* signifas "sen ia ajn manko". En tiu absoluta senco oni ne povas imagi uzon de *pli* aŭ *plej*. Aŭ io estas senmanka, aŭ ĝi ne estas senmanka. Sed *perfekta* havas en reala lingvouzo ankaŭ la relativan signifon "sen **konsiderindaj** mankoj": *Li en la daŭro de kelkaj tagoj **perfekte** ellernis nian lingvon.* [OV.70] Certe ne absolute senmanke, verŝajne nur tiel senmanke kiel oni povas postuli. Tiam *pli* aŭ *plej* fariĝas tute logikaj: *pli perfekta* = "kun malpli da mankoj", *plej perfekta* = "kun malplej da mankoj".

Simile *unika* baze signifas "ununura de sia speco". En tia rigora senco ne estas eble uzi *pli* aŭ *plej*. Sed *unika* havas en la praktiko ankaŭ la signifon "sen konsiderindaj komparaĵoj". Tiam *pli* kaj *plej* estas bone uzeblaj: *pli unika* = "kun malpli da konsiderindaj komparaĵoj", *plej unika* = "kun malplej da konsiderindaj komparaĵoj".

La kritiko kontraŭ tiaj kaj similaj esprimoj estas do malprava. Tia uzado estas nek erara, nek mallogika. Homoj bezonas uzi vortojn kiel *perfekta* kaj *unika* ne nur en absoluta senco, sed ankaŭ en relativa senco:

- *En li mi ĉiam vidis* [...] *modelon de la **plej** <u>perfekta</u> viro.* [IT.22]
- *Ŝia elparolado ne estis la **plej** <u>perfekta</u>, sed ĝi ankaŭ ne prezentis iajn tro gravajn dekliniĝojn.* [M.26]
- *Ĉiuj naciaj lingvoj estas ja multege **malpli** <u>perfektaj</u> ol Esperanto.* [L2.110]
- *Ŝi jam bonege parolas nian lingvon, sed volas ankoraŭ **pliperfektiĝi**.*
- *La **plej** <u>sensencan</u> bagatelon la tuta amaso de l' mondo baldaŭ akceptas, se ĝi nur estas en modo.* [OV.85]
- *Tiu ĉi ekzemplero estas **pli-malpli** <u>unika</u>.*
- *Hodiaŭ mi sentas min **malpli** <u>sola</u> ol hieraŭ.*

## Vortfarado

- *Plia* = "kroma, aldona": *Mi volas du **pliajn** aferojn.*
- *Plie* = "krome, aldone": *Unu paro da manoj **plie** ne montriĝis superflua por revuo, kiu bezonis vastan kunlaboradon.* [M.65]
- *Pleja* = "plej granda": *La **pleja** bono de la lingvo, estas ĝia facileco.* Oni uzas *plej* antaŭ A-vorto aŭ E-vorto, kaj normale *plej granda* antaŭ la responda O-vorto: *plej bona*, *plej bone*, *plej granda bono*. *Pleja* estas ebla, sed malofte uzata alternativo antaŭ O-vorto.
- *Pleje* = "plej multe, plej ofte, plejparte, ĉefe": *Por kia okupo vi sentas vin **pleje** kapabla kaj taŭga?* [M.125] Ĉi tie ankaŭ simpla *plej* estus uzebla. *Oni ĝin* [= ŝian ĉapeton] *nur malofte povis vidi sur tiu loko, kiun tiu ĉi vestaĵo **pleje** okupas ĉe aliaj homoj.* [BV.15] *Li verkis gramatikon kaj vortaron, kiu **pleje** konsistas el vortoj unusilabaj.* [FK.248]

- *Plejsupero* = “plej supera reganto institucio k.s., Dio”.
- *Plejsupera* = “rilata al la plejsupero”: *plejsupera ordono* (ordono de la plejsupero). Komparu kun *plej supera ordono* = ordono, kiu estas super ĉiuj aliaj ordonoj.

### 14.3.16. *Preskaŭ*

*Preskaŭ* = “ne multe malpli ol, ne tute sed mankas nur malmulte, ne vere sed la diferenco estas tre malgranda”. *Preskaŭ* staras kutime ĝuste antaŭ tio, kio ne plene validas, sed iafoje ĝi aperas en alia pozicio:

- *Pasis semajno, pasis **preskaŭ** du semajnoj.* [FA3.28] = *Unue pasis sep tagoj, poste pasis iom malpli ol sep tagoj.*
- ***Preskaŭ** la tuta financa pezo de nia afero kuŝas nun sur la ŝultroj de unu oferema amiko.* [OV.163] Iomete kuŝas sur la ŝultroj de alia persono, sed tio estas nur malmulte.
- *Li rigardis la virinon, kiu staris antaŭ li, per rigardo atenta, **preskaŭ** esplora.* [M.123] Ne vere esplora sed nur atenta, sed la diferenco estis tre malgranda.
- *Mi **preskaŭ** mortis de timo.* [Rz.49] Mi estis tre proksima al morto.
- *La arboj **preskaŭ** rompiĝas sub sia multego da fruktoj.* [Rt.80]
- *Marta ne donis eĉ la plej malgrandan atenton al la nekonata homo, ŝi **preskaŭ** lin ne vidis.* [M.134]
- *Estis jam **preskaŭ** noktomezo.* [M.177] Nur malmulte da tempo restis ĝis noktomezo.
- *Ŝi estis ankoraŭ **preskaŭ** infano, delikata kaj malgrasa.* [FA3.45] Ŝi estis nur iomete pli aĝa ol infano.
- *De tiu obstina batalado ŝi ricevis nenion, aŭ **preskaŭ** nenion.* [M.53]
- *Nun ŝia laboro estis ja **preskaŭ** finita.* [FA1.175]
- *Li estis malsana kaj **preskaŭ** sveninta.* [FA1.217]
- *Ŝia voĉo sonis tre afable, dolĉe, **preskaŭ** ame.* [M.108]
- ***Preskaŭ** ĉiun nokton ili havas balon.* [FA1.29]
- *Ŝi **preskaŭ** ĉiam estis kun li.* [FA3.87]
- *Li **preskaŭ** sen vivo estis pelata de la ondoj.* [FA1.91]
- *Estis tie tiel lume, **preskaŭ** kiel dum la tago.* [M.200]

Ne konfuzu *preskaŭ* kun *apenaŭ* (§14.3.7). Ankaŭ *preskaŭ* kaj *kvazaŭ* (§14.3.12) estas similaj.

### 14.3.17. *Tamen*

*Tamen* = “malgraŭ tio, kontraŭe al tio”. *Tamen* montras kontraston al jam esprimita afero:

- *Mi ne scias la lingvon hispanan, sed per helpo de vortaro hispana-germana mi **tamen** komprenis iom vian leteron.* [FE.34] *Tamen = malgraŭ tio, ke mi ne scias la lingvon hispanan*.

- *Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li **tamen** ne mortigis sin mem.* [FE.39] *Tamen* = *malgraŭ tio, ke li ne mortis per natura morto*.
- *Kiel ajn facilanima kaj nekonstanta li estas, li **tamen** konas la mondon kaj la homojn.* [BV.46] *Tamen* = *malgraŭ la facilanimeco kaj nekonstanteco*.
- *De tiu tempo restis inter ni rilatoj se ne de amikeco, **tamen** almenaŭ de bona konateco.* [M.77] *Tamen* = *malgraŭ la manko de amikeco*. Ĉi tie estas draste mallongigitaj subfrazoj: *... rilatoj, kiuj, se ili ne estis rilatoj de amikeco, estis tamen almenaŭ rilatoj de bona konateco.*
- *La lekanto sentis sin tiel feliĉa, kvazaŭ tiam estus grava festotago, kaj **tamen** tiam estis nur simpla lundo.* [FA1.147] = *... kaj kontraŭe al tio, tiam estis nur simpla lundo.*

Ofte la kontraston jam montras *sed* (§16.3). Tiam *tamen* ne estas necesa. Ĝi nur plifortigas la kontraston.

Ofte la malhelpaĵo estas esprimita per *kvankam*-frazo (§33.7). Ankaŭ tiam *tamen* ne estas necesa, sed povas helpi al klareco: ***Kvankam** la pasintaj tagoj povis ŝin prepari al tia sorto, ĝi **tamen** estis surprizo.* [M.111] *Kvankam* = “malgraŭ tio **ke**” (§12.3.6.6). *Tamen* = “malgraŭ tio”. La vorteto *kvankam* enkondukas subfrazon, kiu montras malhelpaĵon. *Tamen* reprezentas antaŭe diritan malhelpaĵon.

Iuj uzas *tamen* kiel pozitivan respondvorton ĉe neaj demandoj (§22.4).

### 14.3.18. *Tre*

*Tre* = “en alta grado”. *Tre* plifortigas la signifon de A-vortoj, E-vortoj, E-vortecaj vortetoj kaj verboj. *Tre* preskaŭ ĉiam staras antaŭ tio, kion ĝi priskribas kaj plifortigas.

#### A-vorto aŭ E-vorto

Plej ofte *tre* priskribas A-vorton aŭ E-vorton:

- *Li kantas **tre** belan kanton.* [FE.40]
- *La acideco de tiu ĉi vinagro estas **tre** malforta.* [FE.35]
- *Via ago estas **tre** laŭdinda.* [FE.41]
- *Tiu ĉi malfeliĉa infano devis du fojojn en ĉiu tago iri ĉerpi akvon en **tre** malproksima loko.* [FE.13]
- *Lia edzino estas **tre** laborema kaj ŝparema, sed ŝi estas ankaŭ **tre** babilema kaj kriema.* [FE.41]
- *Ni ĉiuj kunvenis, por priparoli **tre** gravan aferon.* [FE.42]
- *La alteco de tiu monto ne estas **tre** granda.* [FE.35]
- *La pafado daŭris **tre** longe.* [FE.40]
- *Ŝi vidis unu sinjorinon, **tre** riĉe vestitan.* [FE.19]
- *“**Tre** volonte, mia bona,” diris la bela knabino.* [FE.15]
- *“Estus **tre** bele,” respondis la filino malĝentile, “ke mi iru al la fonto!”* [FE.19] La frazo estas ironia. Efektive la filino opinias, ke tio tute ne estus bela afero.

Se temas ne pri alta grado, sed pri kvanto aŭ ofteco, oni uzu *multe* (§24.5): *Ŝi etendis al la venintino la manon blankan, tre malgrasan, kun fingroj **multe** pikitaj de kudrilo.* [M.106]

### E-vorteca vorteto

Iafoje *tre* povas priskribi E-vortecan vorteton. Praktike temas nur pri *baldaŭ* kaj iafoje *tre* mem:

- *Nu, pri tio ni **tre** baldaŭ konvinkiĝos!* [FA1.27]
- *Mi estas **tre** tre seniluziigita, ke vi mensogis.* La unua *tre* plifortigas la duan, kiu plifortigas *seniluziigita*. Tia ĉi ripetado aperas precipe en parola lingvaĵo.

### Verbo

*Tre* povas ankaŭ doni pli fortan signifon al verbo:

- *Lia heroeco **tre** plaĉis al mi.* [FE.35]
- *Sinjoro Petro kaj lia edzino **tre** amas miajn infanojn; mi ankaŭ **tre** amas iliajn (infanojn).* [FE.18]
- *Mi vin **tre** dankas.* [Rz.60]

Ĉe verboj oni tamen pli ofte uzas *multe* (§24.5), kiu montras grandan kvanton aŭ oftecon: *Mi **multe** dankas vin por via gastameco.* [Rz.80] *Ŝi **multe** pensis pri tio.* [FA1.33]

### *Ne tre, tre ne*

*Ne tre* estas ofte uzata en speciala maniero por iel mildigi, aŭ por doni ironian nuancon. La efektiva senco estas "tute ne":

- *Mi estas sendato, kiu alportas al vi sciigojn verŝajne **ne tre** agrablajn.* [M.72] = *... verŝajne tute ne agrablajn.*

La maloftega esprimo *tre ne* havas tute alian signifon. Ĝi montras plifortigitan neon: *La sunon kaj la belajn florojn li **tre** ne amis.* [FA1.46] = *... li forte/definitive ne amis.*

### Vortfarado

- *Treege* estas pli forta varianto de *tre*: *Mi nun **treege** bezonas monon.* [L1.52] *Mi estas nun **treege**, **treege** okupita.* [L1.55]
- La formo *trea* estas teorie ebla por priskribi O-vorton: *Ŝi havas **trean** multon da mono.* En la praktiko oni tamen neniam uzas *trea*, sed diras *ŝi havas **tre** grandan kvanton da mono*, aŭ *ŝi havas **tre** multe da mono*. Iafoje oni povas renkonti la strangan formon **tre multo**, sed *tre* ja ne povas priskribi O-vorton. Oni diru *tre multe* aŭ *tre granda kvanto*.

## 14.3.19. *Tro*

*Tro* = "pli ol devus esti". *Tro* plifortigas la signifon de A-vortoj, E-vortoj, E-vortecaj vortetoj kaj verboj. *Tro* preskaŭ ĉiam staras antaŭ tio, kion ĝi priskribas kaj plifortigas:

- *La **tro** multa parolado lacigas lin.* [FE.40] Li parolis pli ol li devus.

- *La pordo estis* ***tro*** *malalta.* [FA3.149] Ĝi devus esti pli alta.
- *Kiu* ***tro*** *multe deziras, nenion akiras.* [PE.628] Pli multe da deziro ol devus esti, aŭ pli multe ol sufiĉus.
- *Ŝvarcvalda horloĝo kun plumbaj peziloj faradis "tik-tak" kaj ĉiam iris* ***tro*** *frue.* [FA2.120] Ĝi ĉiam montris horon pli fruan ol vere estis.
- *Mia ringo valoras tri kaj duonon da spesmiloj, sed vi donis al mi kvar. Mi sekve ricevis duonon da spesmilo* ***tro*** *multe.* [M.192]
- *Se sako* ***tro*** *pleniĝas, ĝi baldaŭ disŝiriĝas.* [PE.885]

### ***Tro*** + klariga esprimo

*Tro* ofte aperas kun klariga esprimo, kiu montras, kiel estus, aŭ kio povus okazi, se la troeco ne ekzistus. La klariga esprimo povas esti subfrazo kun *ke* aŭ *por ke*. Tiaj subfrazoj havas normale ĉefverbon en U-formo, malofte en US-formo:

- *Ilian domon* [...] *oni* [...] *malkonstruis, ĉar ĝi estis* ***tro*** *kaduka,* ***por ke*** *oni povu lasi ĝin stari.* [FA3.23] Se la domo ne estus tiel kaduka, oni povus lasi ĝin stari.
- *Fariĝis vespero, kaj estis* ***tro*** *malproksime,* ***por ke*** *oni povu antaŭ plena noktiĝo atingi la urbon aŭ veni returne hejmen.* [FA1.14]
- *Ŝi estis* ***tro*** *pia kaj senkulpa* ***ke*** *la sorĉa arto povu havi forton sur ŝi.* [FA1.161]
- *La aero tie estas ja multe* ***tro*** *peza,* ***ke*** *prudenta ekzistaĵo tie povu vivi.* [FA1.127]
- *La ideo de lingvo tutmonda estis* ***tro*** *altiranta,* ***por ke*** *la homoj tute rifuziĝus je ĝi.* [OV.259]

La klariga esprimo povas ankaŭ esti *por* + I-verbo:

- *Estas* ***tro*** *mallume,* ***por povi*** *malproksime vidi, kaj* ***tro*** *multe da bruo en la domo,* ***por povi*** *ion aŭdi.* [BV.77] Se ne estus tiel mallume, oni povus malproksime vidi. Se ne estus tiom da bruo, oni povus ion aŭdi.
- *Ĝi ne estos* ***tro*** *malfacila* ***por traduki.*** [M.127] Se ĝi estus pli malfacila, oni eble ne povus ĝin traduki.

### *Maltro, ne tro*

*Maltro* = "malpli ol devus esti, malsufiĉe, ne sufiĉe": *Karlo tro manĝas kaj* ***maltro*** *ekzercas sin. Ni havas* ***maltro*** *da manĝaĵoj.*

*Ne tro* estas ofte uzata en speciala maniero. La efektiva senco estas *maltro*, *ne sufiĉe*. Oni uzas *ne tro* por iel mildigi la diron, aŭ por doni ironian nuancon: *Li havas cerbon* ***ne tro*** *potencan.* [PE.756] = *... cerbon ne sufiĉe potencan.*

### Memstara *tro*

Anstataŭ *tro multe* oni ofte uzas nur *tro*. Tiam *tro* povas roli O-vortece (§24.4), kaj povas esti priskribata de *da*-esprimo:

- ***Tro*** *da kuiristoj kaĉon difektas.* [PE.433] = ***Tro multe*** *da kuiristoj ...*

## Vortfarado

- *Troa* = “en tro granda kvanto, en tro alta grado”. Oni uzas *troa* anstataŭ *tro* por priskribi O-vorton: ***Troa** festeno estas veneno.* [PE.1076] ***Troa** petolo estas danĝera por la kolo.* [PE.973] *Li aĉetis **troan** multon da luksaĵoj.* = *... tro multe da luksaĵoj.* Iafoje oni vidas la formon **tro multo**, sed *tro* ne povas priskribi O-vorton. Oni diru *troa multo*, aŭ pli normale *tro multe*.
- *Troi* = “esti troa”: ***Troas** mia am’!* La verbo *troi* estas sufiĉe malofta, kaj aperas precipe en poezio k.s.
- *Troigi* = 1. “ŝajnigi ke io estas pli granda, pli ampleksa, pli danĝera ... ol ĝi vere estas”: *Vi **troigas**, mia kara.* [M.152] *Kiam ŝi rakontas pri siaj aventuroj, ŝi ĉiam **troigas**, eĉ ne duono estas vero.* 2. “fari tiel ke io estu troa”: *Kiam li trinkas alkoholaĵojn, li ĉiam **troigas**, kaj fariĝas tute ebria.*

# 15. O-vortecaj kaj A-vortecaj vortetoj

O-vortecaj vortetoj (aŭ O-ecaj vortetoj) rolas en frazo kvazaŭ ili estus O-vortoj (§4). Kelkaj el ili similas al personaj pronomoj (§11.1), ĉar ili anstataŭas ne nur O-vortojn, sed tutajn O-vortajn frazpartojn. Oni povas nomi ilin pronomecaj vortetoj. A-vortecaj vortetoj (aŭ A-ecaj vortetoj) rolas same kiel A-vortoj (§5). O-vorteca kaj A-vorteca frazroloj tamen ofte intermiksiĝas.

- La tabelvortoj je U (§15.1) estas pronomecaj kaj A-vortecaj.
- La tabelvortoj je O (§15.2) estas O-vortecaj kaj pronomecaj.
- La tabelvortoj je A (§15.3) estas ĉefe A-vortecaj, sed iafoje pronomecaj.
- La tabelvortoj je ES (§15.4) estas A-vortecaj.
- La vorteto *ambaŭ* (§15.5) estas pronomeca kaj A-vorteca.
- La liternomoj (§15.6) estas O-vortecaj.

O-vortecaj estas ankaŭ la personaj pronomoj (§11). A-vortecaj kaj O-vortecaj estas la nombraj vortetoj (§23). Krome la difina artikolo *la* (§9.1) estas iom A-vorteca.

## 15.1. Tabelvortoj je U

| | |
|---|---|
| ***kiu*** | Demandas pri la identeco de unu el pluraj konataj personoj, aĵoj aŭ aferoj. |
| ***tiu*** | Montras unu certan el pluraj konataj personoj, aĵoj aŭ aferoj. |
| ***iu*** | Montras nekonatan aŭ nedifineblan individuan personon, aĵon aŭ aferon. |
| ***ĉiu*** | Montras unuope kaj senescepte la individuojn de grupo da personoj, aĵoj aŭ aferoj. |
| ***neniu*** | Neas la individuojn de grupo da personoj, aĵoj aŭ aferoj. |

La tabelvortoj je U montras individuecon kaj identecon. Ili estas la plej bazaj el ĉiuj tabelvortoj (§13.1). La klarigoj de preskaŭ ĉiuj aliaj tabelvortoj estas en *PMEG* esprimataj per la U-tabelvortoj.

La tabelvortoj je U povas akcepti N-finaĵon kaj J-finaĵon. Kun J-finaĵo ili montras plurajn individuojn.

La tabelvortoj je U povas roli A-vortece kiel rekta priskribo de O-vorto, ĉu persona O-vorto, ĉu aĵa, ĉu alispeca. Ili povas ankaŭ aperi memstare, kaj tiam oni ĉiam subkomprenas ian postan O-vorton, laŭ la kunteksto aŭ situacio. Se nenio en la kunteksto montras alian subkomprenaĵon, oni normale supozas, ke temas pri la vorto “persono”, “homo” aŭ simile.

La tabelvortoj je U estas difiniloj (§9). Tial oni ne povas uzi *la* (§9.1) kune kun ili.

### *Kiu*

- ***Kiu** kuraĝas rajdi sur leono?* [FE.7] Demanda *kiu*. *Kiu = kiu persono*.
- ***Kiuj** povas esti tiuj fremduloj?* [FA2.92] Demanda *kiuj*. *Kiuj = kiuj personoj*.
- ***Kiun** daton ni havas hodiaŭ?* [FE.12]
- *Se vi scius, **kiu** li estas, vi lin pli estimus.* [FE.26] *Kiu* en demanda subfrazo.
- *Jen estas la pomo, **kiun** mi trovis.* [FE.6] Rilata *kiu*.
- *Mi redonas al vi la monon, **kiun** vi pruntis al mi.* [FE.14]
- *Tio ĉi estis feino, **kiu** prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino.* [FE.14]
- *Ŝi prenis la plej belan arĝentan vazon, **kiu** estis en la loĝejo.* [FE.19]
- *El la kaldrono, en **kiu** sin trovas bolanta akvo, eliras vaporo.* [FE.25]
- *Oni metis antaŭ mi manĝilaron, **kiu** konsistis el telero, kulero, tranĉilo, forko, glaseto por brando, glaso por vino kaj telertuketo.* [FE.34]
- ***Kiu** okupas sin je meĥaniko, estas meĥanikisto, kaj **kiu** okupas sin je ĥemio, estas ĥemiisto.* [FE.32] = *Tiu, **kiu** okupas ...* *Kiu* rilatas al subkomprenataj *tiu*.

### *Tiu*

- *La alteco de **tiu** monto ne estas tre granda.* [FE.35] *Tiu* montras individuan vidatan monton.
- ***Tiu** ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon.* [FE.13]
- *En **tiu** sama tempo ŝi havis teruran malamon kontraŭ la pli juna.* [FE.13]
- ***Tiu** ĉi urbo havas milionon da loĝantoj.* [FE.14]
- ***Tiuj** ĉi du amikoj promenas ĉiam duope.* [FE.14]
- ***Tiuj** estas miaj filinoj. Tiuj* montras iujn el pluraj knabinoj.
- *Kiun el la libroj vi volas? – Mi volas **tiun**. Tiu* montras unu el pluraj libroj.

Iafoje kiam ĉeestas rilata *kiu*-subfrazo, *tiu* povas esti forlasata: §33.4.3.

#### *Tiu(j)* anstataŭ *li, ŝi, ĝi* aŭ *ili*

Kiam *li*, *ŝi*, *ĝi* aŭ *ili* (§11.5) povus esti miskomprenata, oni povas uzi *tiu(j)* kiel alternativon. Tiam *li*, *ŝi*, *ĝi* aŭ *ili* priparolas persono(j)n, kiu(j) en antaŭa frazo estis subjekto, dum *tiu(j)* priparolas alia(j)n persono(j)n en la antaŭa frazo:

- *Jakob alproksimiĝis al sia patro Isaak, kaj **tiu** lin palpis.* [Gn.27] *Tiu* = Isaak. *Lin* = Jakob.
- *Li rakontis al sia edzino pri la malnova domo kaj la maljuna viro kaj pri la stana soldato, kiun li sendis al **tiu**.* [FA2.149] *Tiu = la maljuna viro*.

Laŭ la sama principo oni uzas *ties* (§15.4) anstataŭ *lia*, *ŝia*, *ĝia* aŭ *ilia*. Oni ankaŭ faras similan distingon per la vorteto *ĉi* (§14.1.2).

### *Tiu(j)* anstataŭ ripeto de O-vorto

En iaj frazoj oni uzas *tiu(j)* anstataŭ difinita O-vorto. En tiaj frazoj oni jam uzis ian O-vorton, kaj volas ĝin ripeti kun distinga priskribo, kiu ne estas A-vorto. Anstataŭ ripeti la O-vorton oni uzas *tiu(j)*:

- *Aperis ĉiuj hundoj, **tiu** <u>kun la okuloj kiel tasoj</u>, **tiu** <u>kun la okuloj kiel radoj de muelilo</u> kaj **tiu**, <u>kiu havis okulojn tiel grandajn, kiel rondaj turoj</u>.* [FA1.12] = *... la hundo kun la okuloj kiel tasoj, la hundo kun la okuloj kiel radoj de muelilo ... Tiu* ĉiufoje anstataŭas *la hundo*.
- *Ĉu vi preferas la hajkojn de Buson aŭ **tiujn** <u>de Issa</u>?* = *... aŭ la hajkojn de Issa?*
- *Ili loĝas jen en tiu ĉi domo, jen en **tiu** <u>sur la monteto</u>.* = *... jen en la domo sur la monteto.*

Se la distinga priskribo estas A-vorto, oni ne uzas *tiu(j)*, sed simple forlasas la O-vorton: *Aperis ĉiuj hundoj, la **malgranda*** [hundo]*, la **mezgranda*** [hundo] *kaj la **granda*** [hundo]. *Ĉu vi preferas la verdan teon aŭ la **nigran*** [teon]*?*

### *Iu*

- *Subite li aŭdis, ke **iu** alrajdas de la vojo al la domo.* [FA1.15] *Iu* = "iu persono, persono nekonata".
- *Estis jam ĉirkaŭ vespero, kiam li vekiĝis per tio, ke **iu** lin skuis.* [FA1.217]
- *Ĝi amis ilin tiel, kiel ĝi neniam antaŭe **iun** amis.* [FA2.40]
- *Ili ja ne sciis, ke li estas **iu** alia ol efektiva porkopaŝtisto.* [FA2.18]
- *Ĉiufoje, kiam **iu** malpli altranga ekparolis al li aŭ kuraĝis demandi lin pri io, li respondadis nenion krom "P!".* [FA2.25]

*Iu* estas uzata preskaŭ nur memstare. Povas aperi aliaj rektaj priskriboj, sed la priskribata O-vorto estas normale nur subkomprenata. Se la O-vorto ja aperas, oni plej ofte forlasas *iu*, ĉar la nedifinitecon montras sufiĉe bone la manko de difinilo (§9.1.2). Sed oni ja povas uzi *iu* kune kun O-vorto, se oni volas aparte emfazi la nedifinitecon:

- *Ĉiu ŝanĝo postulus de la lernantoj **iun** aldonan laboron, **iun** tuŝon de la jam akirita alkutimiĝo.* [L1.245]
- *Mi faros miraklojn, kiuj neniam ekzistis sur la tuta tero nek ĉe **iuj** gentoj.* [Er.34]

*Iu* iom similas al individueca aŭ duondifina *unu* (§23.1.3). Anstataŭ *iuj* oni povas ankaŭ uzi *kelkaj* (§24.2), se la ideo de kvanto aŭ nombro estas pli grava.

En maloftegaj okazoj *iu* povas aperi kvazaŭ ordinara O-vorto same kiel *io* (§15.2).

### *Ĉiu*

*Ĉiu(j)* estas ĉiam multe-nombra laŭsence, sed oni tamen faras distingon inter *ĉiu* kaj *ĉiuj*.

- Oni uzas *ĉiu*, se oni konsideras la individuojn aparte.
- Oni uzas *ĉiuj*, se oni pensas pri la tuta grupo kune.

Iafoje tiu distingo ne estas grava, sed alifoje la diferenco estas granda:

- *Por **ĉiu** tago mi ricevas kvin frankojn.* [FE.14] = *Por ĉiu aparta tago ...*
- ***Ĉiu** amas ordinare personon, kiu estas simila al li.* [FE.13] = *Ĉiu aparta homo amas ...*
- *Al **ĉiu** el la infanoj mi donis po tri pomoj.* [FE.14] = *Al ĉiu aparta infano ...*
- *La hundo* [...] *havas du okulojn, el kiuj **ĉiu** estas tiel granda, kiel ronda turo.* [FA1.6] Ĉiu aparta okulo estas tiel granda.
- *Ne **ĉiu** kreskaĵo estas manĝebla.* [FE.41] Aldono de J-finaĵo ne farus multe da diferenco ĉi tie.
- *Kvinope ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis **ĉiujn** kvin atakantojn.* [FE.14] = *... mi venkis la tutan grupon.* Ĉi tie J estas necesa, ĉar oni mencias la nombron kvin. Sed oni povus alternative diri: *... mi venkis ĉiun el la kvin atakantoj.* Sed tiam oni ne parolas pri unu batalo kontraŭ tuta grupo, sed pri kvin pli-malpli apartaj bataloj.
- *Post la kurado **ĉiuj** estis terure lacaj.* Oni parolas pri la tuta grupo de kurintoj. Oni ankaŭ povas diri: *... ĉiu estis terure laca.*
- *El **ĉiuj** miaj infanoj Ernesto estas la plej juna.* [FE.10] = *El la tuta grupo de miaj infanoj ...*
- *Nun mi legas, vi legas kaj li legas; ni **ĉiuj** legas.* [FE.20] *Ni* estas multe-nombra vorto. Tial *ĉiuj* nepre devas havi J.

### *Neniu*

Memstara *neniu* aperas kutime sen J-finaĵo:

- *La tempon venontan **neniu** ankoraŭ konas.* [FE.22] *Neniu* = *neniu persono*.
- *En la salono estis **neniu** krom li kaj lia fianĉino.* [FE.26]
- *Mi konas **neniun** en tiu ĉi urbo.* [FE.28]
- ***Neniu**, krom la reĝo, havas la permeson venadi al ŝi.* [FA1.8]

Ankaŭ kun posta O-vorto oni normale uzas *neniu* sen J:

- ***Neniu** libro estas tiel konata en la tuta civilizita mondo, kiel la Biblio.* [OV.51]
- *Ŝi ne vidis eĉ la ĉielon, ĉar ĝi estis kovrita de nuboj kaj **neniu** stelo en ĝi brilis.* [M.17]
- *Ho ve, nun mi plu havas **neniun** ĉevalon!* [FA1.14]

Oni povas tamen uzi *neniuj*, se oni volas iel montri kontraston kun la ideo "pli ol unu", sed tion oni faras normale nur kiam sekvas O-vorto:

- *Ĉe la fenestro restis plu **neniuj** floroj.* [FA1.34] Antaŭe estis tie multaj floroj.

## Diferenco inter tabelvortoj je A kaj U

La tabelvortoj je A montras econ aŭ specon, dum tabelvortoj je U montras identecon. Ĉe *kia/kiu* kaj *tia/tiu* la diferenco normale estas klara. Ĉe *ia/iu*, *ĉia/ĉiu* kaj *nenia/neniu* estas iafoje nur malgranda diferenco:

- ***Kia** homo li estas?* Oni volas karakterizon de la homo.
- ***Kiu** homo li estas?* Oni volas ekz. la nomon de la homo por ekscii lian identecon.
- ***Tia** opinio estas tute erara.* LR.149A Ĉiuj opinioj de tiu speco estas eraraj.
- ***Tiu** opinio estas tute erara.* La diskutata opinio estas erara. Aliaj similaj opinioj eble estas ĝustaj.
- *Ni devas enloĝiĝi en **ia** hotelo.* OV.562 = *... en hotelo de iu el la diversaj specoj de hoteloj.*
- *Ni devas enloĝiĝi en **iu** hotelo.* = *... en iu el la diversaj individuaj hoteloj, kiuj troviĝas ĉi tie.* Normale oni simple forlasas *iu* en tia frazo.

Ofte la diferenco inter U kaj A respondas al uzo kaj neuzo de *la*:

- *Ĉu vi vidis **la** ĉambriston aŭ **la** kuiriston? – **Neniun** serviston mi vidis.* La demandanto interesiĝas pri du konataj individuoj. La respondanto ne vidis iun el tiuj du individuoj.
- *Ĉu vi vidis ĉambriston aŭ kuiriston? – **Nenian** serviston mi vidis.* La demandanto interesiĝas pri du specoj de servistoj. La respondanto ne vidis serviston, ĉu de ĉambrista speco, ĉu de kuirista speco, ĉu de alia speco.

Oni povus tamen en ambaŭ okazoj uzi *nenian* en la respondo, ĉar se oni eĉ ne vidis ian specon de servisto, tiam oni ja ankaŭ ne vidis iun individuon. Kaj oni povus ankaŭ uzi *neniun* en ambaŭ respondoj, ĉar se oni vidis neniun individuon, oni ja ankaŭ vidis nenian. La diferenco inter tabelvortoj je A kaj U ne ĉiam estas grava. Iafoje oni povas elekti laŭplaĉe sen grava diferenco.

## Diferenco inter tabelvortoj je U kaj O

La tabelvortoj je O estas memstaraj frazpartoj. Ili ne povas priskribi O-vorton. Ili respondas al U-tabelvorto + *afero (objekto/aĵo ...)*:

- ***Kio** estas **tio**? = **Kiu** afero estas **tiu** afero?*
- ***Tio** estas speco de meblo. = **Tiu** afero estas speco de meblo.*
- ***Ĉio** restis kiel antaŭe. = **Ĉiu** afero restis kiel antaŭe.*
- ***Kion** bonan vi trovis tie? = **Kiujn** bonajn aferojn vi trovis tie?*
- ***Nenion** interesan mi trovis. = **Neniun** interesan aferon mi trovis.*

La tabelvortoj je U normale priskribas O-vorton, sed la O-vorto povas esti subkomprenata. Se nenio en la kunteksto montras alie, oni supozas, ke temas pri persono(j):

- ***Kiu** libro estas via? → **Kiu** estas via?*
- ***Tiu** seĝo ŝajnas bona. → **Tiu** ŝajnas bona.*
- ***Ĉiu** homo devas pensi mem. → **Ĉiu** devas pensi mem.*
- ***Kiu** persono venis? → **Kiu** venis?*

- *Ĉu estas **iu*** [persono] *en la kuirejo? – Jes, Paŭlo estas tie.*
- *Jen kelkaj bonaj libroj. **Kiun*** [libron] *vi volas legi? – Mi volas **tiun*** [libron].
- *Ĉu vi havas krajonon? – **Neniun*** [krajonon] *mi havas.*

## 15.2. Tabelvortoj je O

| | |
|---|---|
| ***kio*** | kiu afero, kia afero |
| ***tio*** | tiu afero, tia afero |
| ***io*** | iu afero, ia afero |
| ***ĉio*** | ĉiu afero, ĉia afero |
| ***nenio*** | neniu afero, nenia afero |

La tabelvortoj je O montras aferon, kiun oni ne povas precize nomi per O-vorto. Ĉi tie la ĝenerala vorto "afero" estas uzata kiel klarigo, sed la signifo estas eĉ pli ĝenerala. La tabelvortoj je O estas uzataj ankaŭ por reprezenti ion abstraktan, kion oni esprimis per tuta frazo.

Legu pri la diferenco inter tabelvortoj je O kaj tabelvortoj je U en §15.1.

La tabelvortoj je O povas ricevi N-finaĵon, sed normale ili ne ricevas J-finaĵon, ĉar ili esprimas ĝeneralan tuton.

Rektaj priskriboj de tabelvortoj je O staras ĉiam post la tabelvorto: *io bona*, *kion novan*, *ĉio grava* k.s.

### *Kio*

- ***Kio** brulas?* [FE.31] = *Kia/kiu afero brulas?* Demanda *kio*.
- ***Kion** Dio kreis en la sesa tago?* [FE.12]
- *De **kio** tio ĉi venas, mia filino?* [FE.17]
- ***Kio** estis liaj lastaj vortoj?* [Rt.48]
- *Nu, **kion** mirindan vi trovis? Nu, **kio** venis al vi en la kapon?* [Rz.77]
- ***Kion** vi havis, por diri al mi?* [Rt.5]
- ***Kio** do li estas laŭ via opinio?* [Rz.92] Kiam *kio* rilatas al homo, ĝi normale demandas pri la profesio, la socia rolo aŭ simile, sed ne pri la nomo.
- *Mi neniel povas kompreni, **kion** vi parolas.* [FE.28]
- *Li demandis ŝin, **kion** ŝi faras tie ĉi tute sola kaj pro **kio** ŝi ploras.* [FE.21]
- *Mi de teruro ne sciis, **kion** fari.* [FE.38] Demanda *kio* en mallongigita subfrazo. = *... ne sciis, kion mi faru.*
- *"**Kion** mi vidas!" diris ŝia patrino kun grandega miro. "Ŝajnas al mi, ke el ŝia buŝo elsaltas perloj kaj diamantoj."* [FE.17] Duone ekkria, duone demanda *kio*.
- *Ho, Dio! **kion** vi faras!* [FE.26]
- *La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, **kio** okazis al ŝi.* [FE.17] Rilata *kio*. *Kio* reprezentas la vorton *ĉion* en la ĉeffrazo.

- *Mi volas, ke tio, **kion** mi diris, estu vera.* [FE.24]
- *Ŝi estas ĉio, **kio** restis al mi sur la tero.* [M.31]
- *La sola, **kion** ili deziras, estas nur, ke oni lasu ilin trankvile vivi.* [OV.370]
- *Ili estis forte lacaj, pri **kio** certe neniu miros.* [FA2.107]
- *Li tuj faris, **kion** mi volis.* [FE.31] *Kion* rilatas al subkomprenita *tio*: *... faris tion, **kion** mi volis.*
- *Ili ne havas, **kion** manĝi, ili ne havas, per **kio** hejti la fornon.* [M.102] *= Ili ne havas ion, **kion** ili povus manĝi, ili ne havas ion, per **kio** ili povus hejti la fornon.*
- ***Kio** pri mia frato? = Kio estas pri mia frato? Kio okazis/okazos/okazu pri mia frato?*

### Absoluta *kio*

Zamenhof uzis komence *kio(n)* en malpreciza E-vorteca rolo, kiu ne estas klarigebla per ordinaraj reguloj. Nun oni povas iafoje uzi tiajn frazojn kiel fiksitajn esprimojn, sed normale oni esprimu sin per aliaj vortoj:

- *"**Kio** tuŝas mian foreston hodiaŭ vespere, mia kara",* [...] *"la malfeliĉo estis tute sur mia flanko."* [BV.70] *= Kiam temas pri mia foresto ...*
- ***Kio** ĝi min interesas?* [Rz.30] *= Kiel ĝi min interesas?*
- ***Kion** ni estas kulpaj?* [Rt.14] *= Ĉu vere ni estas kulpaj? Pri kio ni estas kulpaj?*

### *Tio*

- *Mi pagos al ŝi por **tio** ĉi!* [FE.21] *= ... por tiu ĉi afero. Tio* montras ion okazintan aŭ okazantan.
- ***Tio** ĉi estis jam ne simpla pluvo, sed pluvego.* [FE.38] *Tio* montras la veteron.
- ***Tio** tiel kortuŝis la soldaton, ke li estis preta plori.* [FA1.157] *Tio* montras ion okazintan.
- ***Tio** ĉi estis feino.* [FE.15]
- *Ia figuro staris antaŭ lia lito, **tio** estis la fantomo de lia mortinta edzino.* [FA3.14]
- *La esperantismo celas nur al **tio**, ke ia taŭga kaj vivipova komprenilo inter la popoloj ekzistu.* [OV.382]
- *La floroj mallevis siajn kapojn pro **tio**, ke ili estis lacaj de la nokta dancado.* [FA1.33]
- *La reĝido, kiu vidis, ke el ŝia buŝo eliris kelke da perloj kaj kelke da diamantoj, petis ŝin, ke ŝi diru al li, de kie **tio** ĉi venas.* [FE.23]
- *Antaŭ ol mi transiros al la klarigo de **tio**, kiel mi solvis la supre diritajn problemojn, mi devas peti la leganton mediti iom pri la signifo de tiuj ĉi problemoj.* [FK.232]
- *Ĉu mi iam revenos al mia projekto aŭ ne – **tion** mi nun ne povas antaŭvidi.* [L2.201]

- *La pli juna filino, kiu estis la plena portreto de sia patro laŭ sia boneco kaj honesteco, estis krom* ***tio*** *unu el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi.* [FE.11]
- *Certe, mi alportis arĝentan vazon speciale por* ***tio****, por doni trinki al tiu ĉi sinjorino!* [FE.19]
- *Ne estas vera eĉ duono de* ***tio****, kion ili diras.* [Rz.78]
- *Por ĉiu tago mi ricevas kvin frankojn, sed por la hodiaŭa tago mi ricevis duoblan pagon, t. e. (=* ***tio*** *estas) dek frankojn.* [FE.14] *Tio estas* enkondukas draste mallongigitan frazon: ... ***tio*** *estas: mi ricevis dek frankojn.*

Iafoje kiam ĉeestas rilata *kio*-subfrazo, *tio* povas esti forlasata: §33.4.3.

#### *Tio* kaj *ĝi*

Iafoje oni povas heziti inter *tio* kaj *ĝi* (§11.5). Normale oni uzas *tio* pri io nedifinita, kion oni ne povas aŭ volas nomi per preciza O-vorto. Nepre oni uzu *tio* por reprezenti ion, kio estis esprimita per tuta frazo. Oni uzas *ĝi* por io difinita, kiun oni antaŭe esprimis per O-vorto, kaj kion oni povus ripeti per la sama O-vorto kun *la* aŭ alia difinilo:

- *Ŝi rakontis belan fabelon.* ***Tio*** *estis tre amuza.* Amuza estis tio, ke ŝi rakontis fabelon. *Tio* reprezentas la tutan antaŭan frazon.
- *Ŝi rakontis belan fabelon.* ***Ĝi*** *estis tre amuza.* Amuza estis la fabelo. *Ĝi* reprezentas la frazparton ***la*** *(bela) fabelo*.
- *Ĉu* ***tio*** *estis vi, kiu tusis, Janjo?* [M.193] La parolanto aŭdis sonon nesciante, kio kaŭzis ĝin. *Tio* do reprezentas malfacile difineblan aferon.
- *Mi aŭdis, ke branĉo rompiĝas. Ĉu ankaŭ vi aŭdis* ***tion****?*
- *Mi aŭdis strangan sonon. Ĉu ankaŭ vi aŭdis* ***ĝin****?*

Zamenhof iafoje uzis *ĝi*, kiam oni nuntempe preferas *tio*: §11.5.

#### *Io*

- ***Io*** *okazis!* [FA2.92] *= Ia afero okazis.*
- *Neniu* ***ion*** *sciis pri la maniero de ĝia pretigado.* [FA3.126]
- *Mi havas* ***ion*** *por diri al vi, Hermano.* [Rt.39]
- *Gerda denove varmiĝis kaj ricevis* ***ion*** *por manĝi kaj por trinki.* [FA2.71]
- *Nur tiu ne eraras, kiu neniam* ***ion*** *faras.* [PE.551]
- *Kiam vi ekparolis, ni atendis aŭdi* ***ion*** *novan, sed baldaŭ ni vidis, ke ni trompiĝis.* [FE.40]
- *Saĝulo scias* ***ion****, sed neniu scias ĉion.* [PE.992]
- *Tiam oni devas almenaŭ per* ***io*** *kovri, ekzemple per tapiŝeto.* [Rz.81]

#### *Ĉio*

- *Li faris* ***ĉion*** *per la dek fingroj de siaj manoj.* [FE.12]
- *Ŝia fratino en* ***ĉio*** *estas kulpa.* [FE.21]
- *La reĝido konsideris, ke tia kapablo havas pli grandan indon, ol* ***ĉio****, kion oni povus doni dote al alia fraŭlino.* [FE.23]

- *Ne **ĉio** utilas, kio brilas.* PE.87
- ***Ĉio** estis mensogo!* Rt.34
- *Ne **ĉio** brilanta estas diamanto.* PE.87

### *Ĉio tio*

Oni uzas kutime *ĉio (ĉi) tio* anstataŭ *ĉiuj (ĉi) tiuj aferoj* (aŭ anstataŭ *ĉiom de [ĉi] tio*), kvankam tio estas gramatike iom stranga. Normale du O-vortoj aŭ du tabelvortoj je O ne povas tiel priskribi unu la alian:

- *Geografio, universala historio, historio de la pola literaturo... iam mi lernis **ĉion ĉi tion**.* M.32
- *Ŝi parolis **ĉion tion ĉi** kiel monologon.* BV.52
- *Sciu do, ke **ĉio tio**, kio ĉiutage estas alportata al vi de la gazetoj sub la laŭta nomo de "novaj lingvoj internaciaj", estas nur projektoj.* FK.283

Anstataŭ *ĉio tio ĉi* oni povas ankaŭ uzi *ĉio ĉi* aŭ *ĉi ĉio* (§14.1.2).

### *Nenio*

- *La nokto estis tiel malluma, ke ni **nenion** povis vidi eĉ antaŭ nia nazo.* FE.33
- *En la eldiritaj vortoj ŝi aŭdis **nenion** krom moka maljustaĵo.* M.205
- *La postulo de la mastrino de la informa oficejo havis en si **nenion**, kio povus esti rigardata kiel ofenda.* M.26
- ***Nenio** armis min kontraŭ malriĉeco, **nenio** instruis min labori.* M.88
- *Unuj diris absolute **nenion**, aliaj diris tro multe.* FA3.19
- *Li estis homo de gaja, pri **nenio** zorganta vivo.* M.45
- *En la domo estas jam **nenio** por manĝi.* M.19
- *Por meti finon al tiu ĉi akra korespondado, mi decidis paroli jam plu **nenion** pli pri tiu ĉi temo.* L1.68
- *Ekzistas **nenio** certa sur la tero, krom tio, kion la homo posedas en sia propra brusto kaj kapo.* M.15

#### *Nenio* = "io senvalora aŭ malgrava"

Ofte *nenio* estas uzata figure pri senvaloraĵo, malgravaĵo aŭ neglekteblaĵo:

- *Miaj scioj en la regiono de la sciencoj naturaj estas tiel supraĵaj, ke ili estas preskaŭ **nenio**.* M.59
- *En komparo kun tio la korpa sufero estis **nenio**.* FA1.172
- *Kiu havas nenion, estas **nenio**.* PE.15
- *Kulo **nenion** valoras, sed ĝia piko doloras.* PE.1019

## Tabelvortoj je O kun J-finaĵo

Normale tabelvortoj je O ne akceptas J-finaĵon, ĉar ili esprimas ĝeneralan nenombreblan tuton. Sed iuj tamen uzas iafoje la formojn *tioj* kaj *kioj* por paroli pri pluraj apartaj aferoj (nepersonaj):

- *Oni ŝtelis la monon kaj la kasisto malaperis:* ***Tioj*** *(= tio kaj tio) tre malfaciligas la situacion.* Ĉi tie simpla *tio* estas ebla, sed tiam oni prezentas la du malfeliĉaĵojn (la ŝtelon kaj la malaperon) kiel unu solan problemon.
- ***Kioj*** *estas viaj devoj?*

En tiaj frazoj *tiuj* aŭ *ili* ofte ne estas taŭgaj, ĉar ili pensigas pri personoj. Oni povus uzi *tiuj problemoj*, *tiuj du cirkonstancoj*, *kiuj agoj* aŭ ion similan, sed tio devigas trovi ian taŭgan O-vorton, kio ne ĉiam estas facila kaj en iaj okazoj nur ĝena. Uzo de *tioj* kaj *kioj* estas ofte tute logika elturniĝo, se oni volas prezenti plurajn ne precize nomeblajn aferojn kiel apartajn. Sed tia uzo de J-finaĵo post tabelvorto je O estas netradicia kaj ankoraŭ nekutima.

## Kiel ordinaraj O-vortoj

Iafoje, tre malofte, oni uzas tabelvortojn je O kiel ordinarajn O-vortojn. La plej ofta okazo estas *io* uzata ne por *iu afero*, sed por *afero* (kun nuanco de nedifinebleco). En tia uzo la tabelvortoj je O kapablas ricevi J-finaĵon, artikolon, antaŭmetitajn priskribojn k.t.p.:

- *Sed kio estis* ***la aldona io****, pri kiu vi parolis?* [FA3.130] *= ... la aldona afero, pri kiu ...* Oni uzas ĉi tie *kiu* rilate al *io*, ĉar *io* ne estas ordinara tabelvorto plu.
- *Lia potenco konsistas el* ***diversaj ioj****, el kiuj ĉiu aparte per si mem estas ne grava, sed ĉiuj kune donas al li grandan forton.* [LR.107] *= ... el diversaj nedifineblaj aferoj ...*
- *Se iu ion okupas* [...]*, tiam en tiu momento* ***la io*** *estas okupata de* ***la iu****.* [LR.110] Ĉi tie ankaŭ *iu* estas uzata kiel ordinara O-vorto kun *la*.

## Vortfarado

- *Neniaĵo* = "afero simila al nenio, senvaloraĵo": *Viaj kontraŭuloj fariĝos* ***neniaĵo*** *kaj pereos.* [Jes.41]
- *Nenieco* = "eco esti kiel nenio, neekzistado": *Ĉu vi pensas, ke de la brako de la redonanto vi savos vin en la dezerta regno de la* ***nenieco****?* [Rt.130] (≈ *Ĉu vi pensas, ke vi eskapos de Dio post la morto?*)
- *Neniigi*, *neniiĝi* = "igi nenio, detrui, iĝi nenio, detruiĝi": *Mi* ***neniigos*** *vin, kaj vi ne plu ekzistos.* [Jĥ.26] *Kie ne estas konsilo, tie la entreprenoj* ***neniiĝas****.* [SS.15] *La ĉielo* ***disneniiĝos*** *kiel fumo.* [Jes.51]

En la ĉi-antaŭaj kunmetaĵoj oni forigis parton de tabelvorto. Tion oni normale ne povas fari (§13.2). Principe oni devus uzi *nenioaĵo*, *nenioeco*, *nenioigi* kaj *nenioiĝi*, sed tiuj teorie pli regulaj formoj apenaŭ uziĝas praktike. La principe neregulaj formoj estas tradiciaj, akceptitaj esprimoj, kiujn oni plu povas uzi, sed oni ne provu fari novajn similajn vortojn. Komparu kun la simila kunmetaĵo *tiaĵo* (§15.3).

## 15.3. Tabelvortoj je A

| | |
|---|---|
| ***kia*** | de kiu speco, havanta kiun econ |
| ***tia*** | de tiu speco, havanta tiun econ |
| ***ia*** | de iu speco, havanta iun econ |
| ***ĉia*** | de ĉiu speco, havanta ĉiun econ |
| ***nenia*** | de neniu speco, havanta neniun econ |

La tabelvortoj je A rolas A-vortece kaj priskribas la samajn specojn de vortoj kiel A-vortoj (§5). Ili ricevas J-finaĵon kaj N-finaĵon laŭ la samaj reguloj kiel A-vortoj. Sed tabelvortoj je A montras ĉiam ecojn kaj specojn, dum vortoj kun vera A-finaĵo povas havi multe pli variajn signifojn (§37.2.2).

La tabelvortoj je A estas difiniloj (§9). Tial oni ne povas uzi *la* (§9.1) kune kun ili.

Legu pri la diferenco inter tabelvortoj je A kaj tabelvortoj je U en §15.1.

### *Kia*

- ***Kia*** *li estas? Ĉu li estas maljuna aŭ juna?* [Rz.39] Demanda *kia*.
- ***Kia*** *supo ĝi estas? Vi simple akvon enverŝis en la tason.* [Rz.27]
- ***Kian*** *aĝon vi havas?* [M.155]
- ***Kia*** *estas via nomo?* [FA1.56] Aŭ: *Kiu* [el ĉiuj nomoj] *estas via nomo?* Aŭ pli ofte: *Kio estas via nomo?* Zamenhof uzis ankaŭ: *Kiel estas via nomo?* [Rz.63] Plej ofte oni tamen diras: *Kiel vi nomiĝas?*
- *Ni ŝajnigu, kvazaŭ ni tute ne scias,* ***kia*** *homo li estas.* [Rz.32] *Kia* en demanda subfrazo.
- *Ŝi sentis,* ***kian*** *por ŝi nefavoran impreson ŝia ludado faris sur la virino.* [M.28]
- ***Kia*** *ĝoja festo!* [FE.10] Ekkria *kia*.
- ***Kia*** *bela persono ŝi estas!* ***kiaj*** *okuloj!* ***kiaj*** *haroj! staturo de reĝino!* [M.46]
- ***Kian*** *belan sabron kaj grandan tornistron vi havas!* [FA1.5]
- ***Kia*** *estas via laboro, tia estas via valoro.* [PE.851] Rilata *kia*.
- *Nun konfirmiĝis do lia opinio, ke ŝi ne estas tia,* ***kia*** *devas esti reĝino.* [FA1.174]
- *Tiu ĉambro havis ŝajnon de saloneto; sed en efektiveco ĝi estis komercejo tia sama,* ***kiaj*** *estas ĉiuj aliaj komercejoj.* [M.20]
- *La bildo ne estis tia,* ***kiajn*** *oni ordinare vidas, ne, ĝi havis en si vivon.* [FA1.191]

Se post *tia* aŭ *(tia) sama* ne sekvas tuta frazo (kun ĉefverbo), sed sola frazparto, tiam oni ne uzas *kia*, sed komparan *kiel* (§20.1.1): *Ĝia uzado estas tia sama* ***kiel*** *<u>en la aliaj lingvoj</u>.* [FE.27] *La virineto de maro vidis, ke ŝi havas korpon tian* ***kiel*** *<u>ili</u>.* [FA1.105]

### *Tia*

- *Dio gardu! mi estas tute moderna, kaj **tia** oni devas esti.* [FA3.50] *Tia* montras la antaŭe diritan econ.
- *Mi ne apartenas al **tiaj** personoj.* [M.85] *Tia* montras ion antaŭe diritan.
- *Be! li staris senhelpe, **tian** respondon li ne atendis.* [FA3.97]
- *Estis **tia** ventego, ke la tegoloj deflugis de la tegmentoj.* [FA1.77] *Tia* almontras la postan *ke*-frazon.
- *Mi havas **tian** senton kvazaŭ mi kisus mian patrinon!* [FA2.26] *Tia* almontras la postan *kvazaŭ*-frazon.
- *Restu ĉiam **tia**, kia vi estas!* [FA3.60] *Tia* almontras la postan *kia*-frazon.
- *La arbo de la suno estis belega arbo **tia**, kian ni neniam vidis.* [FA3.114]
- *Tie estis **tia** izoliteco, kiun ŝi neniam antaŭe spertis.* [FA1.163] *Tia* almontras la postan *kiu*-frazon.
- *Mi ĝojas, ke vi havas **tian** saman opinion, kiel mi.* [Rz.59] *Tia* almontras la postan *kiel*-komparon.
- *Ne skribu al mi **tiajn** longajn leterojn.* [FE.18] *Tiajn* difinas la tutan frazparton *longajn leterojn*. Oni povus ankaŭ uzi *tiel*, kiu priskribus nur la A-vorton *longajn*. La signifodiferenco estas tre malgranda.
- *Al tiuj ĉi prefiksoj kaj sufiksoj estas donita la signifo de memstaraj vortoj, kaj kiel **tiaj** ili estas lokitaj en la vortaro.* [FK.233] *Tiaj = memstaraj vortoj*.
- *Ne, tio ĉi estas jam tro ... **Tia** aroganteco!* [Rz.75] *= ... Tia aroganteco estas neakceptebla!* (aŭ simile). En tia ekkria uzo oni pli ofte uzas *kia* (§32.1).

Iafoje kiam ĉeestas rilata *kia*-subfrazo, *tia* povas esti forlasata: §33.4.3.

### *Ia*

- *Via vino estas nur **ia** abomena acidaĵo.* [FE.35]
- *Ni ne povis atingi **ian** rezultaton.* [FE.42]
- *Ili kuradas tien kaj reen, kvazaŭ ili havus **ian** laboron.* [FA2.153]
- *En la pordega arkaĵo staris ankoraŭ Alecĉjo kaj interparolis mallaŭte kun **ia** juna viro.* [M.172]
- *Ib en timego elsaltis sur la teron kaj kuris **ian** distancon.* [FA3.88]
- *Ne ekzistas homo, kiu ne havus **iajn** pekojn.* [Rz.8]
- *Pri talento mi neniam aŭdis, ke vi **ian** havas.* [M.156]

### *Ĉia*

- *Maldiligenteco estas la radiko de **ĉia** malbono.* [FA3.122]
- ***Ĉia** dono estas bono.* [PE.351]
- *Ŝi meritis **ĉian** laŭdon.* [FA1.82]
- *En **ĉia** okazo la artikoloj devas ĉiam esti subskribitaj per plena nomo kaj adreso.* [OV.98]

- *La plej granda parto de la publiko estas tute indiferenta por* ***ĉia*** *nova afero.* OV.85
- *La cikonio-patro alflugadis ĉiutage kun bongustaj ranoj, malgrandaj serpentoj kaj* ***ĉiaj*** *troveblaj frandaĵoj por cikonioj.* FA1.207

### *Nenia*

- ***Nenia*** *Dio ekzistas!* Rt.127
- ***Nenia*** *konstruo povas esti sen bruo.* PE.327
- *Pli da mono ŝi ne havis, kaj laborenspezon ŝi havis* ***nenian****.* M.178
- *Ĉu ekzistas* ***nenia*** *loko en la mondo, kie mi povus ion ellerni? Diru al mi, sinjoro, diru, diru!*[...] *– mi konas* ***nenian*** *tian lokon.* M.137
- ***Nenia*** *dancistino povos flirtadi tiel gracie kiel vi.* FA1.95
- *Kun la malnova domo ili volas havi* ***neniajn*** *rilatojn.* FA2.143

### Vortfarado

- *Tiaĵo* = "tia aĵo, afero tia": *Mi ne ŝatas* ***tiaĵojn****.* Principe oni devus uzi *tiaaĵo* anstataŭ *tiaĵo*. Pri tiaj principe neregulaj kunmetaĵoj vidu ĉi-antaŭe ĉe tabelvortoj je O (§15.2), kaj ankaŭ ĉe la klarigoj pri tabelvortaj post-partoj kaj ordinaraj finaĵoj (§13.2).

## 15.4. Tabelvortoj je ES

| | |
|---|---|
| ***kies*** | (la)... de kiu(j) |
| ***ties*** | (la)... de tiu(j) |
| ***ies*** | (la)... de iu |
| ***ĉies*** | (la)... de ĉiu(j) |
| ***nenies*** | (la)... de neniu |

La tabelvortoj je ES ĉiam enhavas la signifon de la rolvorteto *de*, sed *de* havas plurajn signifojn (§12.3.2). El tiuj signifoj, la ES-vortoj havas ĉefe **posedan** aŭ **apartenan** signifon, sed ili povas ankaŭ montri **sencan objekton** aŭ **sencan subjekton**. La ES-vortoj havas do la samajn specojn de signifoj kiel la posedaj pronomoj (§11.2).

ES-vorto, kiu estas rekta priskribo, aldonas difinitan signifon al sia frazparto. ES-vortoj do estas difiniloj (§9) – same kiel la posedaj pronomoj – kaj oni ne povas uzi *la* (§9.1) kune kun ili. Se oni anstataŭigas ES-vorton per *de*-esprimo, oni normale devas aldoni *la*.

Same kiel posedaj pronomoj la ES-vortoj staras antaŭ la priskribata afero, dum samsignifa *de*-esprimo devas stari poste. Ĝuste tio estas la kialo, ke la ES-vortoj ekzistas, ĉar kelkaj specoj de frazoj funkcias pli bone, se poseda esprimo povas stari antaŭ la posedata afero (§33.4.1.3).

ES-vortoj ne povas ricevi J-finaĵon aŭ N-finaĵon.

### *Kies*

- ***Kies** tombo tio ĉi estas?* H.147 = *La tombo de kiu (persono) tio ĉi estas?* Demanda *kies*.
- ***Kies** filino vi estas?* Gn.24
- *Sinjoro, **kies** tiuj ĉi soldatoj? – De la norvego.* H.119 = *... de kiu (persono) estas tiuj ĉi soldatoj?...* Mallongigita demando. La ĉefverbo mankas.
- *Mi efektive ne scias, **kies** kulpo ĝi estas.* M.105 *Kies* en demanda subfrazo.
- *Scias la kato, **kies** lardon ĝi manĝis.* PE.314
- *La vidvino ekvidis virinon,* [...] ***kies** vizaĝon ŝi en la krepusko ne rekonis, sed **kies** mallonga jupo* [...] *montris, ke ŝi estas virino popolamasa.* M.10 Rilataj *kies*.
- *Ŝi* [...] *levis la rigardon kaj la manojn al la peco da ĉielo, **kies** malluma kaj profunda fono brilis per steloj.* M.94
- *Al Delfoj! kie troviĝas centoj da lokoj, ĉe **kies** nomo la koro ekbatas per vojaĝdeziro.* FA1.225
- *Nek al ni, nek al iu alia venis en la kapon diri, ke ĝi estas ia ennovaĵo, pri **kies** akceptado aŭ neakceptado oni devas konsiliĝi.* OV.102 *Kies* montras sencan objekton: *kies akceptado → la akceptado de kio → la akceptado de ia ennovaĵo → oni akceptus ian ennovaĵon*.

### *Ties*

*Ties* ne estas tre multe uzata. Normale oni preferas posedajn pronomojn (*lia*, *ŝia*, *ĝia* aŭ *ilia*). *Ties* estas uzata ĉefe por almontri antaŭan subfrazon, aŭ kunlabore kun *kies*:

- *<u>Kiu</u> eĉ nur gratetos al li la haŭton aŭ difektos al li eĉ unu haron, **ties** karnon mi disŝiros je pecoj kaj donos ĝin kiel manĝon al malsataj vulturoj!* Rt.121 *Ties* montras la subjekton de la antaŭa *kiu*-frazo.
- *<u>Kies</u> gasto mi estas, **ties** feston mi festas.* PE.1187 *Ties* almontras la antaŭan *kies*.

*Ties* estas ankaŭ uzebla por fari distingon inter malsamaj personoj aŭ aferoj. Tiam prefere tio, kio antaŭe aperis kiel subjekto, estu reprezentata de *lia*, *ŝia*, *ĝia* aŭ *ilia*, dum alia persono, aĵo aŭ grupo estu reprezentata per *ties*:

- *La infano ludis kun sia pupo, kiam subite **ties** kapo frakasiĝis. Ties* montras, ke temas pri la kapo de la pupo. Se estus la kapo de la infano, oni dirus *ĝia kapo*, *lia kapo* aŭ *ŝia kapo*.

Legu pli pri tia distingado per *tiu(j)*: §15.1.

### *Ies*

*Ies* estas kutime uzata nur pri unu nekonata persono (ne pri aĵoj, nek pri pluraj aferoj aŭ personoj):

- *Kiu ĝojas pri **ies** malfeliĉo, tiu ne restos sen puno.* SS.17 = *... pri la malfeliĉo de iu persono ...*
- *Ĉu vi ne scias, ke ĉiun tagon estas **ies** tago de naskiĝo?* BV.14

- *En la sama momento ŝi sentis, ke* ***ies*** *forta mano ŝin kaptas.* [FA3.45]

### *Ĉies*

*Ĉies* estas kutime uzata nur pri personoj, ne pri aĵoj:

- *Tio estis la koro de riĉa fama viro, kies nomo estis sur* ***ĉies*** *lipoj.* [FA1.131] = *... sur la lipoj de ĉiuj personoj.*
- ***Ĉies*** *okuloj kun teruro deturniĝis de tiu homo.* [Rt.126]
- *Klopodi pri* ***ĉies*** *favoro estas pleje malsaĝa laboro.* [PE.343]

### *Nenies*

*Nenies* estas kutime uzata nur pri personoj, ne pri aĵoj:

- *Memoru, ke Esperanto estas* ***nenies*** *propraĵo.* [OV.388] = *... ke Esperanto estas la propraĵo de neniu persono.*
- *Mi estas nun tre kontenta, ĉar mi havas mian panon kaj bezonas jam* ***nenies*** *helpon.* [L1.114] *Nenies* montras sencan subjekton. = *... mi bezonas jam helpon fare de neniu persono.*
- ***Nenies*** *opinion mi akceptas blinde.* [OV.543]

### Vortfarado

- *Ĉiesul(in)o* = "prostituit(in)o": *Se mi voluptas pri korpa plezuro – mi iras al strataj* ***ĉiesulinoj****, kaj havas ĉion kion mi deziras.*
- *Ĉiesaĵo* = "io (precipe komputila programo) senpage uzebla de ĉiu ajn": *Tie troviĝas kolekto da* ***ĉiesaĵoj*** *senkoste elŝuteblaj.*

## 15.5. *Ambaŭ*

*Ambaŭ* = "ĉiuj du". Oni uzas *ambaŭ* anstataŭ *ĉiuj* (§15.1), kiam estas precize du aferoj aŭ personoj.

*Ambaŭ* povas roli en frazo tute same kiel *ĉiuj*, kiel rekta priskribo, pronomece k.t.p. *Ambaŭ* estas ofte uzata kune kun *vi*, *ni* aŭ *ili* por precizigi, ke temas pri precize du. Tiam *ambaŭ* rolas kiel apudmeto (§25.3).

*Ambaŭ* tamen ne povas ricevi J-finaĵon aŭ N-finaĵon.

*Ambaŭ* estas difinilo (§9). Tial oni ne povas uzi *la* (§9.1) kune kun *ambaŭ* (same kiel ne eblas **la ĉiuj**).

- ***Ambaŭ frazoj*** *estas bonaj!* [LR.120A] Estas du frazoj. Ĉiu el ili estas bona.
- *La pli maljuna* [filino] *estis tiel simila al la patrino per sia karaktero kaj vizaĝo, ke ĉiu, kiu ŝin vidis, povis pensi, ke li vidas la patrinon; ili* ***ambaŭ*** *estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, ke oni ne povis vivi kun ili.* [FE.11] = *... ĉiuj du* [la filino kaj la patrino] *estis tiel malagrablaj ...*
- *Mi penos viziti vin iun alian tagon, kiam ni* ***ambaŭ****, vi kaj mi, estos liberaj.* [OV.538]
- *Pli bone estas iri seninfana en la ĉielon, ol se* ***ambaŭ****, la patro kaj la filo, iras en la inferon.* [Rt.10]

Zamenhof iafoje uzis *ambaŭ* anstataŭ *du*: *Ĉiuj sidiĝas ĉirkaŭ la* ***ambaŭ*** *Pjotroj Ivanoviĉoj.* [Rz.13] *Ĝi* [= la rivero] *inundis siajn* ***ambaŭ*** *bordojn.* [Kr1.12]. Oni uzu *du* en tiaj frazoj: *Ĉiuj sidiĝas ĉirkaŭ la du Pjotroj Ivanoviĉoj. Ĝi inundis siajn du bordojn.* Oni tamen povas bone diri ekz.: *Ĝi inundis* ***ambaŭ siajn*** *bordojn.*

Por kontroli, ĉu *ambaŭ* estas ĝuste uzata, oni ŝanĝu la frazon tiel, ke ĝi temas pri pli ol du aferoj. Se oni tiam uzus senprobleme *ĉiuj*, oni scias, ke *ambaŭ* estas ĝuste uzata, kiam temas pri du.

## 15.6. Liternomoj

La nomoj de la Esperantaj literoj estas: *a*, *bo*, *co*, *ĉo*, *do*, *e*, *fo*, *go*, *ĝo*, *ho*, *ĥo*, *i*, *jo*, *ĵo*, *ko*, *lo*, *mo*, *no*, *o*, *po*, *ro*, *so*, *ŝo*, *to*, *u*, *ŭo*, *vo*, *zo*.

La liternomojn oni uzas por paroli pri la literoj mem, por klarigi, kiel vorto estas skribata, kaj por elparoli mallongigojn. La "o" de la konsonantaj nomoj ne estas O-finaĵo, sed elparolhelpa vokalo. Diversaj finaĵoj povas aldoniĝi, sed la "o" ĉiam restas.

La liternomoj povas aperi O-vortece en frazo sen aldono de finaĵo:

- *Tiu vorto komenciĝas per* ***B*** [= "bo"] *kaj finiĝas per* ***A*** [= "a"].
- ***Ŭ*** [= "ŭo"] *estas* ***U*** [= "u"] *kun supersigno.*
- *La vorto "lingvo" estas skribata:* ***"lo, i, no, go, vo, o"***.
- *Mi planas partopreni en la* ***IJK*** [= "i, jo, ko"]. En la mallongigo *IJK* (= *Internacia Junulara Kongreso*) ĉiu litero estas kutime elparolata kiel aparta vorto (§2.2).
- *La nomo "Anno" estas skribata per du* ***N*** [= "no"].

Oni povas aldoni finaĵojn laŭ bezono. Se oni volas aldoni J-finaĵon aŭ N-finaĵon, oni devas unue almeti O-finaĵon:

- *Tiu vorto estas skribata per du* ***B-oj*** [= "b**ó**oj"]. Aŭ: ... *per du B* [= "bo"].
- *Sur la papero estis tri* ***A-oj*** [= "**á**oj"]. Aŭ: ... *tri A* [= "a"].
- *Mi partoprenis en tri* ***IJK-oj*** [= "i-jo-k**ó**-oj"]. Aŭ: ... *en tri* ***IJK*** [= "i jo ko"].
- *Ŝi foliumis* ***PIV*** [= "piv"]. Oni ankaŭ povas aldoni N-finaĵon: *Ŝi foliumis* ***PIV-on*** [= "pivon"]. Se oni aldonas A-vorton, tiu nepre havu N-finaĵon: *Ŝi foliumis* ***malnovan PIV(-on)***. La mallongigo *PIV* (= *Plena Ilustrita Vortaro*) estas kutime elparolata kiel vorto (§2.2).
- *Li elparolis la* ***R-ojn*** [= "r**ó**ojn"] *de ĉiuj vortoj tre forte.*

Por uzi liternomon A-vortece aŭ E-vortece oni devas uzi A-finaĵon aŭ E-finaĵon (sed apenaŭ estas okazoj uzi verbajn finaĵojn):

- *La* ***n-a*** [= "n**ó**a"] *potenco de dek.* Matematika esprimo (la litero "n" simbolas ĉiun ajn nombron).

**Noto:** Multaj asertas, ke la "o" de la liternomoj ja estas O-finaĵo, sed normale ili tamen en la praktiko sekvas la ĉi-antaŭajn regulojn. Sed kelkaj fakte traktas tiujn ĉi helpvokalojn kiel verajn O-finaĵojn. Ili diras: *bo*, *boj*, *bon*, *bojn*, *ba*, *baj*, *ban*, *bajn*, k.t.p. Tio tamen estas malrekomendinda.

La principoj por uzi liternomojn en frazoj similas al la uzo de ne-esperantigitaj propraj nomoj (§35.2) kaj citaĵoj (§36).

Ankaŭ multaj ne-Esperantaj liternomoj (§19) estas vortetoj.

Aperis diversaj proponoj de aliaj liternomoj, sed neniu propono fariĝis vaste uzata. Oni restu ĉe la Fundamentaj liternomoj. Ili estas la solaj, kiuj funkcias praktike, ĉar nur ili estas konataj de ĉiuj esperantistoj.

En ekz. telefonado la ordinaraj liternomoj tamen povas esti malfacile aŭdeblaj. Kiam en tiaj okazoj oni bezonas klarigi la literumadon de vorto, oni povas uzi "literuman alfabeton", kie ĉiu litero estas reprezentata de tuta vorto. La sekva literuma alfabeto estas uzata de Universala Esperanto-Asocio:

***A**sfalto*, ***B**arbaro*, ***C**entimetro*, ***Ĉ**efo*, ***D**oktoro*, ***E**lemento*, ***F**abriko*, ***G**umo*, ***Ĝ**irafo*, ***H**otelo*, ***Ĥ**aoso*, ***I**nsekto*, ***J**ubileo*, ***Ĵ**urnalo*, ***K**ilogramo*, ***L**egendo*, ***M**aŝino*, ***N**aturo*, ***O**ktobro*, ***P**apero*, ***R**ekordo*, ***S**alato*, ***Ŝ**ilingo*, ***T**riumfo*, ***U**niverso*, ***Ŭ** Universo-hoko*, ***V**ulkano*, ***Z**inko*.

La ne-Esperantajn literojn Q, W, X kaj Y oni en tiaj okazoj nomu per iliaj plenaj Esperantaj nomoj (§1.2).

# 16. Kunligaj vortetoj

En tiu ĉi paragrafo estas klarigoj pri la kunligaj vortetoj *kaj* (§16.1), *aŭ* (§16.2), *sed* (§16.3), *plus* kaj *minus* (§16.4). Kunliga vorteto estas ankaŭ *nek* (§21).

## 16.1. *Kaj*

*Kaj* ligas plurajn vortojn aŭ vortgrupojn, kiuj ludas la saman rolon en la frazo:

- *Karlo* ***kaj*** *Petro manĝas.* Du personoj faras la saman agon. Estas du subjektoj.
- *Karlo manĝas* ***kaj*** *trinkas.* Karlo faras du agojn (samtempe aŭ sinsekve). Estas du ĉefverboj.
- *Karlo manĝas rizon* ***kaj*** *legomojn.* Du aferoj estas trafataj de la sama ago en la sama maniero. Estas du objektoj samspecaj.
- *Petro manĝas per forko* ***kaj*** *tranĉilo.* Du iloj helpas al la sama ago. Oni ne bezonas ripeti la rolvorteton antaŭ ambaŭ. La unua rolvorteto sufiĉas por montri la rolon ankaŭ de la vorto post *kaj*. Sed oni povas ĝin ripeti: *per forko* ***kaj*** *per tranĉilo*.
- *Antaŭen sen halto* ***kaj*** *timo!* [FK.313] = *Antaŭen sen halto* ***kaj*** *sen timo!*
- *Petro estas maljuna* ***kaj*** *saĝa.* Du ecoj estas ligitaj al la sama subjekto per la sama verbo. Estas du perverbaj priskriboj.
- *Karlo kantas bele* ***kaj*** *elegante.* Estas du manieraj komplementoj.
- *Petro havas grandan* ***kaj*** *luksan domon.* Kiam du A-vortoj rekte priskribas la saman O-vorton, oni ofte forlasas *kaj*: *Petro havas grandan luksan domon.*
- *Li havas domon el ligno* ***kaj*** *el ŝtono.* Du frazpartoj kun rolvorteto rekte priskribas la saman O-vorton. Oni povas forlasi la duan *el*: *... el ligno* ***kaj*** *ŝtono.*
- *Karlo laboras por* ***kaj*** *per Esperanto.* La vorto *Esperanto* partoprenas en du roloj en la frazo. Anstataŭ diri *por Esperanto* ***kaj*** *per Esperanto* oni ligas la du rolvortetojn per *kaj*, kio estas pli eleganta.

### Pli ol du elementoj

Se estas pli ol du elementoj en tia listo, oni kutime metas *kaj* nur antaŭ la lasta, precipe se estas tre longa elnombrado de aferoj. Tie, kie mankas *kaj*, oni elparole povas iomete paŭzi. Skribe oni tie metas komon:

- *Petro, Karlo, Elizabeto* ***kaj*** *Eva vojaĝis kune al la kongreso. = Petro kaj Karlo kaj Elizabeto kaj Eva vojaĝis ...*
- *Hodiaŭ ni manĝos supon, salaton, viandaĵon, frititajn terpomojn* ***kaj*** *glaciaĵon.*
- *Petro laboras per fosiloj, hakiloj, martelo, segilo* ***kaj*** *multaj aliaj aferoj.*
- *Karlo laboras tro rapide, senzorge* ***kaj*** *malracie.*

- *La domo de Petro estas granda, luksa, komforta, bela* ***kaj*** *bonege konstruita.*
- *Karlo laboras por, per, pri* ***kaj*** *en Esperanto.*

Legu ankaŭ pri evitado de N-finaĵo en apudmeto, kiu estas longa listo en §25.3.

### *Kaj* inter tutaj frazoj

*Kaj* povas ligi tutajn frazojn, kiuj iamaniere kunapartenas. La ligitaj frazoj devas esti samspecaj. Aŭ ili ĉiuj estas ĉeffrazoj, aŭ ili ĉiuj estas subfrazoj:

- *Petro legis la gazeton,* ***kaj*** *Karlo rigardis televidon.* Du ligitaj ĉeffrazoj.
- *Anno iros promenigi la hundon,* ***kaj*** *Elizabeto restos hejme.* Du ligitaj ĉeffrazoj.
- *Li iras per aŭto,* ***(kaj)*** *ŝi iras per trajno,* ***kaj*** *mi iras piede.* Tri ligitaj ĉeffrazoj. Kiel kutime oni preferas meti *kaj* nur antaŭ la lasta.
- *Ili diris, ke ili tre amuziĝis,* ***kaj*** *ke ili volonte revenos venontjare.* Du ligitaj *ke*-frazoj. Ambaŭ estas objekto de la ĉefverbo *diris*.
- *Jen venas tiu knabino, kiu savis mian vivon,* ***kaj*** *kiu poste malaperis.* Du ligitaj *kiu*-frazoj. Ambaŭ estas rekta priskribo de *tiu knabino*.
- *Mi volas foriri, ĉar mi estas laca,* ***kaj*** *ĉar mi havas kapdoloron.* Du ligitaj *ĉar*-frazoj. Ambaŭ montras kialon de la ĉeffrazo *mi volas foriri*.
- *Mi volas foriri, ĉar mi estas laca,* ***kaj*** *mi havas kapdoloron.* Du ligitaj frazoj, kiuj kune formas unu *ĉar*-frazon. La du frazoj kune montras kialon de la ĉeffrazo. Praktike apenaŭ estas diferenco inter ĉi tiu ekzemplo, kaj la antaŭa.
- *Li diris,* ***kaj*** *ke li fartas malbone,* ***kaj*** *ke li volas kuniri.*

Kiam pluraj frazoj estas ligitaj, oni ofte povas forlasi frazelementojn, kiuj aperas en ĉiuj frazoj (§32.3). Tio tamen ne ĉiam estas ebla.

### *Kaj ... kaj*

Por emfazi kaj insisti oni povas uzi *kaj* antaŭ ĉiuj partoj de elnombrado, ankaŭ antaŭ la unua. Legu pri *kaj ... kaj* en la klarigoj pri kombinitaj vortetoj en §17.5.

### Forlaso de *kaj*

Iafoje oni plene forlasas *kaj* en tiaj ĉi elnombradoj:

- *La (tre malmultajn) vortojn kun "um" oni devas lerni, kiel simplajn vortojn. Ekzemple: plenumi, kolumo, manumo.* [FE.42]
- *Faru el tio incensaĵon kunmetitan laŭ la arto de la ŝmiraĵisto, bone frotmiksitan, puran, sanktan.* [Er.30]
- *Varsovio ĝojis, bruis, brilis.* [M.115]
- *Ĉu vi scias, ke li edziĝas kun mia filino, ke mi mem estos grandrangulo, ke mi forsendigos rekte en Siberion?* [Rz.92]

### Diversspecaj rilatoj inter ligitaj frazoj

Kiam *kaj* ligas frazojn, la ligo povas reprezenti diversajn signiforilatojn. Kia estas la rilato, oni devas kompreni el la kunteksto. Oni povas klarigi la rilaton per aldonaj esprimoj:

- *Mi lavis la vestaĵojn,* ***kaj*** *(poste) mi sekigis ilin. Kaj* montras tempan sinsekvon. La vorto *poste* je bezono povas helpi al kompreno.
- *Ŝi aŭdis teruran bruon,* ***kaj*** *(tial) ŝi telefonis al la polico. Kaj* montras sekvon aŭ rezulton. *Tial* povas helpi al kompreno.
- *Anno estas gaja persono,* ***kaj*** *(kontraste) Elizabeto estas silentema. Kaj* montras kontraston. Oni ankaŭ povas uzi *dum* por esprimi kontraston (§33.7): *Anno estas gaja persono,* **dum** *Elizabeto estas silentema.*
- *Ni klopodis per ĉiuj fortoj,* ***kaj*** *(tamen) ni malsukcesis. Kaj* montras neatenditan sekvon. *Tamen* povas pliklarigi tion. Ankoraŭ pli klara estus *sed* (§16.3) anstataŭ *kaj*.
- *Demandu ilin,* ***kaj*** *vi aŭdos, kion ili diros al vi.* [FA1.58] *Kaj* montras kondiĉan rilaton inter la frazoj. *Tiam* povas helpi al la kompreno: ... *kaj tiam vi aŭdos* ... Eĉ pli klare estus transformi la unuan frazon en subfrazon kun *se* (§33.5): ***Se*** *vi demandos ilin, (tiam) vi aŭdos* .... Tiam oni ne povas uzi *kaj*, ĉar la du frazoj ne plu estas samspecaj. Unu estas subfrazo, kaj la alia estas ĉeffrazo.
- *Ŝi havas brunajn okulojn,* ***kaj*** *(aldone) ŝiaj haroj estas longaj. Kaj* montras aldonan informon.
- *Li preferis foriri tre frue de la festo,* ***kaj*** *tio ne surprizas min, ĉar vere estis tre enue tie. Kaj* montras komenton.

## 16.2. *Aŭ*

*Aŭ* funkcias same kiel *kaj* (§16.1). Ĝi povas ligi la samajn aferojn en la samaj manieroj, sed *aŭ* montras, ke la ligitaj aferoj estas **alternativoj**. *Aŭ* montras, ke oni povas fari elekton inter la ligitaj aferoj, aŭ ke estas necerte, kiu el ili validas:

- *Petro* ***aŭ*** *Karlo laboras.* Du eblaj subjektoj. Unu el ili laboras, eventuale ambaŭ.
- *Ni povas manĝi viandaĵon* ***aŭ*** *fiŝaĵon. Kion vi preferas?* Elekto inter du rektaj objektoj.
- *Vi devas fari tion per fosilo* ***aŭ*** *(per) hakilo.* Elekto inter du iloj.
- *Ĝi estis ruĝa* ***aŭ*** *flava. Mi ne memoras klare.* Du alternativaj perverbaj priskriboj.
- *Mi povas france* ***aŭ*** *itale paroli. Vi elektu!* Elekto inter du manieroj.
- *Mi konstruus lignan* ***aŭ*** *ŝtonan domon.* Elekto inter du ecoj.
- *Mi ŝatus loĝi en domo sur monto* ***aŭ*** *ĉe maro.* Elekto inter du lokoj.
- *Ĉu estas eble konstrui aŭton kun kvin* ***aŭ*** *ses radoj?* Elekto inter du nombroj.
- *La kato troviĝas sur* ***aŭ*** *sub la domo.* Elekto inter du pozicioj.

### Pli ol du elementoj

Se estas pli ol du elementoj en tia listo, oni kutime metas *aŭ* nur antaŭ la lasta, precipe se estas tre longa elnombrado de aferoj. Tie, kie mankas *aŭ*, oni elparole povas iomete paŭzi. Skribe oni tie metas komon:

- *Vi povas vojaĝi per trajno, buso, aŭto **aŭ** biciklo.*
- *Kiu povas helpi min? Eble Karlo, Petro **aŭ** Elizabeto.*
- *Ĉu vi volas glaciaĵon citronan, ĉokoladan, fragan **aŭ** vanilan?*

Legu ankaŭ pri evitado de N-finaĵo en apudmeto, kiu estas longa listo en §25.3.

### *Aŭ* inter tutaj frazoj

*Aŭ* povas ligi tutajn frazojn, kiuj iamaniere kunapartenas. La ligitaj frazoj devas esti samspecaj. Aŭ ili ĉiuj estas ĉeffrazoj, aŭ ili ĉiuj estas subfrazoj:

- *Ĉu mi kapablas plenumi tiajn laborojn **aŭ** ĉu mi ne kapablas?* [M.133]
- *La* [...] *pasantoj* [...] *forflankiĝis antaŭ ŝi, supozante, ke ŝi estas frenezulino **aŭ** ke ŝi havas ian urĝegan bezonon rapidi.* [M.210]
- *Ŝi ne sciis, ĉu ŝi nur sonĝis **aŭ** ĉu tio estis efektivaĵo.* [FA1.163]
- *Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, **aŭ** kiun oni uzas por vino.* [FE.32]

Kiam pluraj frazoj estas ligitaj, oni ofte povas forlasi frazelementojn, kiuj aperas en ĉiuj frazoj (§32.3). Tio tamen ne ĉiam estas ebla.

### Ekskluziva kaj inkluziva *aŭ*

Normale *aŭ* estas ekskluziva. Tio signifas, ke nur unu el la alternativoj povas validi. Iafoje tamen *aŭ* estas inkluziva. Tiam ĝi permesas, ke oni elektu pli ol unu el la alternativoj (eventuale eĉ ĉiujn). Ĉu *aŭ* estas inkluziva aŭ ekskluziva, montras la kunteksto:

- *Ĉu hodiaŭ estas varme **aŭ** malvarme?* [FE.25] Normale ne povas esti kaj varme kaj malvarme samtempe (en la sama loko).
- *Vi povas dormi en la gastlito, **aŭ** vi povas serĉi hotelon.* Normale ne estus eble elekti ambaŭ.
- *Ĉu vi volas kafon **aŭ** teon?* La demandanto verŝajne intencas, ke la demandato elektu nur unu trinkaĵon, ne ambaŭ.
- *Estu apud la reĝo, kiam li eniros **aŭ** eliros.* [Kr2.23] Ja estas eble esti apud la reĝo, kaj kiam li eniros, kaj kiam li eliros (sed ne samtempe).
- *Ni povas kuiri omleton, **aŭ** ni povas fari salaton.* Teorie oni povus fari ambaŭ, sed oni normale komprenas, ke oni devas elekti unu el la alternativoj. La inkluziva senco tamen estas ebla. Por montri klare la eblon elekti ambaŭ estas plej bone rekte diri tion: *Ni povas kuiri omleton, **(aŭ)** ni povas fari salaton, **aŭ** ni povas fari ambaŭ.*

Por klare montri, ke *aŭ* estas ekskluziva, oni povas uzi *aŭ* antaŭ ĉiu alternativo (§17.1).

Por montri, ke *aŭ* estas inkluziva, oni iafoje, precipe en skriba lingvo, uzas la esprimon *kaj/aŭ*: *La vojaĝo okazos per trajno **kaj/aŭ** buso.* = *La vojaĝo okazos per trajno **aŭ** buso, **aŭ** per trajno **kaj** buso. La vojaĝo okazos per trajno **aŭ** buso **aŭ** ambaŭ.* Aperis duboj, kiel elparoli *kaj/aŭ*. La suprenstreko reprezentas la signifon *aŭ*, sed oni malemas diri *kaj aŭ aŭ*. Pli volonte oni diras simple *kaj aŭ*, sed tion iuj opinias tro mallogika. Normale oni ne uzas *kaj/aŭ* en la parola lingvo, nur en la skriba. Ŝajnas rekomendinde eviti *kaj/aŭ* ankaŭ en skriba uzo. Pli bone estas rekte eldiri la eblon elekti ĉiujn alternativojn.

La okazintaj provoj enkonduki la novan vorton **kaŭ**° por *kaj/aŭ* estas senesperaj.

### *Aŭ* post neo

Kiam *aŭ* aperas post neado, ĝi logike egalas al *nek* (§21):

- *Li neniam fumas **aŭ** drinkas.* La nea vorto *neniam* rilatas al *fumas aŭ drinkas* kune. = *Li neniam fumas **nek** drinkas.*

Se oni uzas *kaj*, la signifo ŝanĝiĝas: *Li neniam fumas **kaj** drinkas.* Li neniam faras ambaŭ agojn samtempe, sed eble li faras ilin aparte.

### *Aŭ ... aŭ*

Se oni metas *aŭ* ankaŭ antaŭ la unua afero, oni montras, ke la prezentitaj alternativoj estas nepre la solaj. Devas esti unu el ili, neniu alia. Legu pri *aŭ ... aŭ* en la klarigoj pri kombinitaj vortetoj en §17.1.

### Specialaj uzoj de *aŭ*

*Aŭ* povas montri alternativan nomon de la sama afero:

- *La makropo **aŭ** kanguruo estas aŭstralia besto. Makropo* kaj *kanguruo* estas tute samsignifaj vortoj. En tiaj ĉi okazoj oni normale ne ripetas eventualan *la* antaŭ la dua nomo.
- *Patriotismo **aŭ** servado al la patrujo mi nomas nur la servadon al la bono de ĉiuj miaj samregnanoj.* [OV.318] La du esprimoj estas malsamaj nomoj de la sama afero.

Iafoje la dua nomo povas esti pli bona alternativo. Oni aldonas ĝin pli-malpli kiel korekton. Por emfazi, ke temas pri korekto, oni povas aldoni *pli bone*, *pli vere*, *pli ĝuste*, *pli trafe*, *prefere* aŭ similan esprimon:

- *Kun ĉi tiuj vortoj eniris, **aŭ pli vere** enŝetis sin en la ĉambron virino.* [M.27] *Eniris* ne estis sufiĉe trafa esprimo.

Iafoje *aŭ* montras, kio okazus, se la antaŭa alternativo ne efektiviĝus:

- *Iru, mi diras, **aŭ** mi trapikos vin trae.* [Rt.132] = *Iru, mi diras. Se vi ne iros, mi trapikos vin trae.*
- *Enŝaltu la radion, **aŭ** ni maltrafos la novaĵojn.* = *Se vi ne enŝaltos la radion, ni maltrafos la novaĵojn.*

## 16.3. *Sed*

*Sed* ligas frazojn aŭ frazpartojn, kaj montras, ke ili iel kontrastas inter si:

- *La papero estas tre blanka,* **sed** *la neĝo estas pli blanka.* [FE.10]
- *Li amas min,* **sed** *mi lin ne amas.* [FE.18]
- *Mi zorgas pri ŝi tiel, kiel mi zorgas pri mi mem;* **sed** *ŝi mem tute ne zorgas pri si kaj tute sin ne gardas.* [FE.18]
- *Laŭ la projekto de la inĝenieroj tiu ĉi fervojo estas konstruota en la daŭro de du jaroj;* **sed** *mi pensas, ke ĝi estos konstruata pli ol tri jarojn.* [FE.25]
- *Nia provincestro estas severa,* **sed** *justa.* [FE.37]
- *Tiu domo estis mallarĝa,* **sed** *alta.* [M.6]
- *Pli bona estas knabo malriĉa* **sed** *saĝa, ol reĝo maljuna* **sed** *malsaĝa.* [Pr.4]
- *Li havis* [...] *unu filinon, belan, mildan kaj saĝan,* **sed** *blindan.* [FA3.116]

*Sed* povas ankaŭ enkonduki ion, kio malebligas aŭ malhelpas la antaŭan aferon:

- *Mi volis lin bati,* **sed** *li forkuris de mi.* [FE.18]
- *Mi volis ŝlosi la pordon,* **sed** *mi perdis la ŝlosilon.* [FE.34]

*Sed* povas enkonduki ion, kio estas surpriza, se oni konsideras la antaŭan aferon:

- *Kvinope ili sin ĵetis sur min,* **sed** *mi venkis ĉiujn kvin atakantojn.* [FE.14]
- *Mi kriis tiel laŭte, kiel mi povis,* **sed** *neniu min aŭdis, mi estis tro malproksime.* [FA3.152]
- *Mia frato ne estas granda,* **sed** *li ne estas ankaŭ malgranda: li estas de meza kresko.* [FE.33]
- *Li donis al mi monon,* **sed** *mi ĝin tuj redonis al li.* [FE.42]
- *Melankolio* **sed** *ne doloro, plenigis lian bruston.* [FA3.64]

Se la antaŭaj vortoj esprimas neadon de io, *sed* povas enkonduki tion, kio validas anstataŭe:

- *La patro <u>ne</u> legas libron,* **sed** *li skribas leteron.* [FE.9]
- *Se nia afero <u>ne</u> mortis,* **sed** *vivas kaj floras, tio ĉi estas en tre granda parto merito de la mortinto.* [OV.223]
- *Mi <u>ne</u> pendigis mian ĉapon sur tiu ĉi arbeto;* **sed** *la vento forblovis de mia kapo la ĉapon, kaj ĝi, flugante, pendiĝis sur la branĉoj de la arbeto.* [FE.39]
- *Tio ĉi estis jam <u>ne</u> simpla pluvo,* **sed** *pluvego.* [FE.38]
- *Ne la febro, <u>ne</u> la malsano,* **sed** *la maljuneco lin paralizis.* [FA3.146]
- *Mi deziras <u>ne</u> la morton de malvirtulo,* **sed** *ke la malvirtulo deturnu sin de sia vojo kaj restu vivanta.* [Jĥ.33]
- *La plej granda parto de la publiko nenion scias <u>ne</u> sole pri nia lingvo,* **sed** *ankaŭ pri la ideo de lingvo tutmonda entute.* [OV.93] Ili nenion scias pri

nia lingvo, kaj ankaŭ nenion pri la ideo de lingvo tutmonda. La *sed*-frazo kontrastas al *ne sole*.

- *Mi scias, ke vi estas ne sole librovendisto,* ***sed*** *ankaŭ libreldonisto.* M.122

Iafoje *sed* montras kontraston al io subkomprenata:

- *Ankoraŭ unu fojon ripetu al ŝi la adreson,* ***sed*** *malrapide.* Estas subkomprenate, ke oni antaŭe diris la adreson tro rapide.
- *Post malpli ol duonhoro ŝi revenis,* ***sed*** *ne sola.* M.194 Oni supozis, ke ŝi revenos sola.
- *Anstataŭ kafo li donis al mi teon kun sukero,* ***sed*** *sen kremo.* FE.26 Oni supozis, ke estos ankaŭ kremo en la teo.
- *Mi venas nur kun mia edzino,* ***sed*** *sen mia frato.* L1.172 Oni supozis, ke ankaŭ la frato venos.

## Nuanca *sed*

Nuanca *sed* ne ligas du aferojn, sed enkondukas frazon, kiu esprimas ŝanĝon de paroltemo aŭ interrompon:

- ***Sed*** *ni ne parolos plu pri tiu ĉi punkto.* FK.262 Oni povas imagi subkomprenitan antaŭfrazon: *Ni povus daŭrigi,* ***sed*** *...*
- ***Sed*** *ni revenu al nia interrompita analizado.* FK.268 Oni povas imagi la antaŭfrazon: *Mi povus paroli pli pri tio ĉi,* ***sed*** *...*

Nuanca *sed* povas ankaŭ enkonduki elkrion de surprizo aŭ malkonsento. Tiam oni iafoje povus diri, ke *sed* kontrastas al la eldiro de alia persono:

- *Mi donos al vi kvin eŭrojn. –* ***Sed*** *tio ne estas justa!*
- *Li venkis en la konkurso. –* ***Sed*** *tio estas ja bonega!*

## *Sed* kaj *tamen*

*Sed* ofte aperas kune kun *tamen* (§14.3.17), kiu tiam emfazas la kontraston:

- *Mi ne scias la lingvon hispanan,* ***sed*** *per helpo de vortaro hispana-germana mi* ***tamen*** *komprenis iom vian leteron.* FE.34
- *Ŝi havis forton kaj ŝi estis laborema,* ***sed*** *ŝi* ***tamen*** *restis malriĉa.* FA3.68

Se oni uzas *tamen*, oni povus ofte same bone uzi *kaj* anstataŭ *sed*, ĉar la kontraston sufiĉe bone esprimas *tamen*:

- *Li havis la impreson, ke li sonĝas* ***kaj tamen*** *ne sonĝas.* FA2.132
- *La lekanto sentis sin tiel feliĉa, kvazaŭ tiam estus grava festotago,* ***kaj tamen*** *tiam estis nur simpla lundo.* FA1.147

*Tamen* normale rolas kiel komplemento, dum *sed* estas kunliga vorteto. Tial *sed* aperas komence de sia frazo, dum *tamen* povas aperi en diversaj pozicioj ene de la frazo.

### *Tamen* anstataŭ *sed*

Iafoje *tamen* aperas komence de ĉeffrazo, kiu estas tre proksime ligita al la antaŭa ĉeffrazo. Tiam *tamen* ekhavas ian frazligan rolon. *Tamen* tiam praktike egalas al *sed*. Oni povus ankaŭ diri, ke *sed* aŭ *kaj* estas subkomprenata:

- *Li estas tre ekkolerema kaj ekscitiĝas ofte ĉe la plej malgranda bagatelo;* ***tamen*** *li estas tre pardonema, li ne portas longe la koleron kaj li tute ne estas venĝema.* FE.41
- *Seninfana estis la edzeco de la rabeno;* ***tamen*** *ĉirkaŭ li ne mankis vivado kaj moviĝado.* Rn.8
- *La buŝo de Marta iom ekmoviĝis,* ***tamen*** *ĝi eligis nenian sonon.* M.135
- *Ŝi demandis, videble devigante sin esti serioza,* ***tamen*** *ne povante tute kaŝi rideton.* M.46

## 16.4. *Plus* kaj *minus*

La vortetoj *plus* kaj *minus* estas ĉefe uzataj en matematikaj kaj similaj esprimoj por reprezenti la simbolojn + (*plus*) kaj − (*minus*). *Plus* montras adicion, pozitivecon k.s. *Minus* montras subtrahon, negativecon k.s. Gramatikaj reguloj apenaŭ rolas en tia uzado. Oni simple elparolas la simbolon + per la vorto *plus*, kaj la simbolon − per la vorto *minus*:

- 2 + 2 = 4 → *Du* ***plus*** *du faras kvar.*
- 3 − 1 = 2 → *Tri* ***minus*** *unu estas du.*
- 20000 + 3000 = 23000 → *Dudek mil* ***plus*** *tri mil estas dudek tri mil.*
- 20000 − 3000 = 17000 → *Dudek mil* ***minus*** *tri mil egalas al dek sep mil.*
- +10° → ***plus*** *dek gradoj = dek gradoj super nulo*
- −10° → ***minus*** *dek gradoj = dek gradoj sub nulo*
- *+3 (**plus** tri) estas pozitiva nombro.*
- *−3 (**minus** tri) estas negativa nombro.*

Legu pli pri matematikaj esprimoj en §23.7.

Iafoje *plus* estas uzata en ordinaraj frazoj anstataŭ *kaj*, kiam temas pri adicio aŭ simile. *Minus* povas simile anstataŭi *sed ne*, kiam temas pri subtraho aŭ simile:

- *Ĝi kostas dek eŭrojn* ***plus*** *kvindek cendojn. = ... kaj aldone kvindek cendojn.*
- *Necesas sperto* ***plus*** *zorgemo. = ... kaj ankaŭ zorgemo.*
- *Mi pagos al vi 1000 eŭrojn* ***minus*** *la 100 eŭrojn, kiujn vi ŝuldas al mi. Mi do pagos sume 900 eŭrojn.*

Iuj uzas *plus* kaj *minus* kiel rolvortetojn (§12.3), simile al *kun* (§12.3.6.4) kaj *sen* (§12.3.6.12) (do ĉiam sen posta N-finaĵo). Estas tamen preferinde uzi *plus* kaj *minus* kiel kunligajn vortetojn laŭ la ĉi-antaŭaj ekzemploj, metante N-finaĵon, kiam la frazrolo tion postulas.

### Vortfarado

- *Pluso* = "pozitiva nombro aŭ rezulto"; *minuso* = "negativa nombro aŭ rezulto": *Pasintjare la komercado finiĝis per granda* ***minuso****, sed ĉi-jare ĝi finfine rezultiĝis en* ***pluso****.* Ankaŭ la signojn + kaj − oni povas nomi respektive *pluso* kaj *minuso*: *Oni enskribis* [...] *duon kun* ***minuso****!* Gm.54 (Temas pri lerneja noto: 2−.) Ofte oni tamen nomas tiujn signojn simple *plus* kaj *minus*.

## 16.5. Vortostumpoj

Iafoje, precipe en skriba lingvaĵo, oni uzas *kaj* aŭ alian kunligan vorteton por ligi du aŭ pli da partoj de kunmetita vorto por mallongigi frazon:

- *Ili en-* ***kaj*** *el-iris tre rapide. = Ili eniris* ***kaj*** *eliris tre rapide.*
- *Tio estas kombinita manĝaĵ-* ***kaj*** *gazet-vendejo. = ... manĝaĵvendejo* ***kaj*** *gazetvendejo.*
- *Li faris multajn erarojn: skrib-, leg-* ***kaj*** *pens-erarojn. = ... skriberarojn, legerarojn* ***kaj*** *penserarojn.*
- *Tute mankas sub-tasoj* ***kaj*** *-teleroj. = ... subtasoj* ***kaj*** *subteleroj.*
- *Tio estas manĝaĵ-* ***aŭ*** *gazet-vendejo. = ... manĝaĵvendejo* ***aŭ*** *gazetvendejo.*
- *Tio estas manĝaĵ-,* ***sed*** *ankaŭ gazet-vendejo. = ... manĝaĵvendejo,* ***sed*** *ankaŭ gazetvendejo.*

Ĉi tiaj frazoj estas sufiĉe nenaturaj. Ĝenerale ili estas malkonsilindaj, precipe kiam ili enhavas vortostumpojn sen finaĵoj, kio normale ne estas ebla en Esperanto. Ĉu ekz. *manĝaĵ-* estas unu vorto? Kiel akcenti ĝin? Ĉu sur la antaŭlastan vokalon: *mánĝaĵ-*, aŭ sur la lastan vokalon kontraŭ la reguloj pri akcento: *manĝáĵ-*? Oni prefere uzu aliajn rimedojn mallongigi, ekz. jene:

- *Ili iris en la domon* ***kaj*** *el ĝi tre rapide.*
- *Tio estas kombinita manĝaĵa* ***kaj*** *gazeta vendejo.*
- *Li faris multajn erarojn skribajn, legajn* ***kaj*** *pensajn.*
- *Tio estas vendejo de manĝaĵoj,* ***sed*** *ankaŭ de gazetoj.*

# 17. Kombinitaj vortetoj

Iuj vortetoj aperas pare aŭ pluroble kun specialaj signifoj. Oni povas nomi ilin kombinitaj vortetoj.

## 17.1. *Aŭ ... aŭ*

Duobla aŭ plurobla *aŭ* (§16.2) (kun *aŭ* ankaŭ antaŭ la unua alternativo) montras, ke la prezentataj ebloj estas nepre la solaj. Devas esti unu el ili, neniu alia. Parole oni tiam normale emfaze akcentas je *aŭ*:

- *Karlo manĝis **aŭ** pomon **aŭ** piron.* Li manĝis unu el tiuj du fruktoj, sed ne ambaŭ.
- *Ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros **aŭ** floro **aŭ** multekosta ŝtono.* [FE.15] Nepre eliros el via buŝo unu el la nomitaj ebloj.
- *Oni devas **aŭ** ridi **aŭ** plori je tiuj ĉi ridindaj senkonsekvencoj.* [BV.30] Oni ne povas fari ambaŭ, kaj oni ne povas fari ion alian ol tiuj du alternativoj.
- ***Aŭ** mi vidas veran fata-morganon, kiel oni tion nomas, **aŭ** mi estas ebria!* [FA1.118]
- *Oni povus diri, ke **aŭ** ŝi forgesis ĉion en la mondo, **aŭ** ŝi ne havis forton, por iri pluen.* [M.192]

## 17.2. *Ĉu ... ĉu*

Ordinara *ĉu* (§22.2) montras demandon. Duobla aŭ plurobla *ĉu* normale ne havas tian signifon, sed montras anstataŭe **indiferentecon**. Indiferenta *ĉu* montras alternativojn, inter kiuj la elekto estas indiferenta, libera, egala, pridubata, necerta aŭ simile.

Indiferenta *ĉu* povas enkonduki subfrazojn, inter kiuj la elekto estas indiferenta. La ĉeffrazo montras ion, kio validas sendepende de la elekto inter la alternativoj. Tiaj subfrazoj ofte estas mallongigitaj:

- *Li devis trinki kun ili, **ĉu** li volis, **ĉu** li ne volis.* [FA1.122] Lia volo nenion povis ŝanĝi.
- *Ĉiu povas veni, tute egale, **ĉu** li estas reĝido, **ĉu*** [li estas] *almozulo.* [FA1.69] Kaj reĝidoj kaj almozuloj povas veni. Ne gravis, kio oni estis.

Indiferenta *ĉu* povas ankaŭ enkonduki frazpartojn, inter kiuj oni povas elekti. Tiam *ĉu ... ĉu* povas esti tre simila al *aŭ ... aŭ*. *Ĉu ... ĉu* emfazas indiferentecon, dum *aŭ ... aŭ* nur montras alternativojn:

- ***Ĉu** pro timo, **ĉu** pro fiereco, li nenion respondis.* [LR.122] Oni ne scias, kiu el la du alternativoj kaŭzis, ke li nenion respondis, sed tio ne gravas.
- ***Ĉu** bona, **ĉu** malbona – ĉiu mem por sia far' ricevas rekompencon.* [IT.36] Ne gravas, ĉu oni estas bona aŭ malbona.
- *Tio estas la leĝo pri naskintino, **ĉu** de knabo, **ĉu** de knabino.* [Lv.12] La leĝo validas egale por virino, kiu naskis knabon, kaj por virino, kiu naskis knabinon.

Unu sola *ĉu* povas montri nur demandon. Pluraj *ĉu* povas esti indiferenta *ĉu*, sed povas ankaŭ esti pluraj sinsekvaj demandoj:

- *Ekzistas nenia eblo antaŭvidi,* ***ĉu*** *tiu ĉi laboro entute sukcesos al la komitato,* ***ĉu*** *ĝi ne daŭros senfinan serion da jaroj,* ***ĉu*** *ĝi en konsenteco estos alkondukita al feliĉa fino, kaj* ***ĉu*** *la finita laboro en la praktiko montriĝos tute taŭga.* [FK.293] Tie ĉi *ĉu* ne esprimas dubon aŭ necertecon. Estas simple kvar demandaj subfrazoj.

En alternativdemandoj oni ne uzu *ĉu ... ĉu*, sed *ĉu ... aŭ*: ***Ĉu*** *esti* ***aŭ*** *ne esti, – tiel staras nun la demando.* [H.74] *Rigardu,* ***ĉu*** *ĝi estas la vesto de via filo,* ***aŭ*** *ne?* [Rt.51]

## 17.3. *Jen ... jen*

Ordinara *jen* (§14.3.11) altiras la atenton al io. Duobla aŭ plurobla *jen* ne havas tian signifon, sed enkondukas alternativojn, kiuj alternas, aŭ eblojn, kiuj validas alterne. *Jen ... jen* = *iufoje ... alifoje*.

Alterna *jen* povas aperi kaj antaŭ tutaj frazoj, kaj antaŭ unuopaj frazpartoj:

- ***Jen*** *mi ardas de varmego,* ***jen*** *mi tremas de frosto.* [FA1.150] La du statoj alternas. Iufoje mi estas varma, alifoje mi estas malvarma.
- *Ŝia vizaĝo aperigis* ***jen*** *mortan palecon,* ***jen*** *koloron de sango.* [M.159] La vizaĝo ŝanĝiĝadis.
- *Ĝi* [= sonorilo en fabelo] *rakontas senĉese, tre ofte la samajn aferojn,* ***jen*** *mallonge* ***jen*** *longe, kiel diktas al ĝi la kaprico.* [FA4.68] Iufoje la sonorilo rakontas mallonge, alifoje longe.
- *Ĝi* [= la maro] *estis ja* ***jen*** *ruĝa,* ***jen*** *verda,* ***jen*** *blua.* [FA1.230] La koloro ŝanĝiĝis, aŭ estis malsama en diversaj lokoj.
- *Mario videble havis deziron* ***jen*** *koleri,* ***jen*** *ridi,* ***jen*** *premi la manon al tiu ventanimulo.* [M.56]
- *Li* [...] *okupadis sin* ***jen*** *per tio,* ***jen*** *per alio.* [FA3.139]

## 17.4. *Ju ... des*

*Ju* kaj *des* estas ĉiam uzataj kune kun *pli* aŭ *malpli* (§14.3.15). *Ju* kaj *des* kunlabore montras, ke unu *pli*-esprimo dependas de alia. La *ju*-esprimo montras tion, kio regas. La *des*-esprimo montras tion, kio dependas. Se *ju-pli*-esprimo kreskas, ankaŭ la responda *des-pli*-esprimo kreskas:

- ***Ju pli*** *da mono ni havos,* ***des pli*** *rapide kaj bone iros kompreneble nia afero.* [OV.127] Se la mono pliiĝos, tiam ankaŭ la rapideco kaj boneco pliiĝos.
- ***Ju pli*** *alte staras la lingvo,* ***des pli*** *rapide progresas la popolo.* [FK.229] La progreso de la popolo dependas de la nivelo de ĝia lingvo.
- ***Ju pli*** *malmulte vi parolos pri tiu ĉi afero,* ***des pli*** *bone.* [BV.87]
- ***Ju pli*** *da havo,* ***des pli*** *da pravo.* [PE.106]

Se oni uzas *ju pli* kune kun *des malpli*, temas pri kresko, kiu kaŭzas malkreskon. Inverse *ju malpli* kunlabore kun *des pli* montras, ke malkresko kaŭzas kreskon:

- ***Ju pli** da bruo, **des malpli** da ĝuo.* PE.31
- ***Ju malpli** da bonodoro ili* [= la floroj] *havis, **des pli** fiere ili alte tenis sian kapon.* FA1.119 Tiuj floroj, al kiuj mankis bonodoro, kompensis tion per fiere alta tenado de la kapoj.
- ***Ju pli** grandaj ili fariĝis, **des malpli** ili volis tion toleri.* FA1.209 Kiam ili kreskis en grandeco, ili malkreskis en toleremo.
- ***Ju pli** klare vi elparolas, kaj **ju malpli** da malfacilaj vortoj vi uzas, **des pli** bone oni komprenas vin.* Pliiĝo de la klareco kaj malpliiĝo de la malfacilaj vortoj kaŭzas pliboniĝon de la kompreno.

### *Ju ... tiom*

Baze *des* havas la saman signifon kiel *tiom* (§14.3.3). La sola diferenco estas, ke *des* kunlaboras kun *ju*. Zamenhof tamen iafoje uzis *tiom* ankaŭ kune kun *ju*:

- ***Ju pli** da laborantoj estos, **tiom pli** rapide estos finita la granda konstruo.* FK.297 Estus nenia sencodiferenco, se oni ŝanĝus *tiom* al *des*. *Des* estas preferinda, ĉar pli kutima kaj tial pli klara.

### Sola *des*

Iafoje *des* aperas sola, sen *ju*. Tiam *ju*-esprimo (ofte tuta frazo kun *ju*-esprimo) estas iel subkomprenata:

- *La saloneto* [...] *ne estis vasta, tial **des pli** frapis la okulojn la eleganteco de ĝia aranĝo.* M.148 Subkomprenata estas la ideo: *Ju pli malvasta estas eleganta salono, des pli la eleganteco frapas la okulojn.*
- *Baldaŭ ili ekamis la silenteman submajstron, kiu malmulte parolis, sed **des pli** multe laboris.* FA3.64 Subkomprenata ideo: *Ju pli malmulte oni parolas, des pli multe oni laboras.*

Ofte sola *des* aperas en dufrazaj konstruoj, kie temas pri la vereco, la valideco, de la du frazoj:

- *Neniu iam gustumis tian supon, **des pli** neniu ion sciis pri la maniero de ĝia pretigado.* FA3.126 = *Ju pli estas vere, ke neniu gustumis, des pli estas vere, ke neniu ion sciis pri la maniero de pretigado.*

Sola *des* estas iafoje uzata kune kun *ke*-frazo, kiu montras kroman motivon por io:

- *Eble estos plej bone, se ni ĝin* [= la historion] *ankaŭ aŭskultos, **des pli** ke ĝi estas mallonga.* FA3.57 Subkomprenata ideo: *Ju pli mallonga estas historio, des pli facile estas ĝin aŭskulti.*

Sola *des* povas ofte esti anstataŭigita per *tiom* (§14.3.3). Eble estas konsilinde uzi *des*, se oni iel subkomprenas *ju*-ideon, kaj *tiom*, se nenia *ju*-ideo rolas.

### **Ju ... ju**

En kelkaj lingvoj oni povas uzi la saman vorton por la dependa kaj la reganta *pli*-esprimoj. Tio ne estas ebla en Esperanto. **Ju ... ju** ne havas sencon. La reganta *(mal)pli*-esprimo havu *ju*, kaj la dependa *(mal)pli*-esprimo havu *des*. Ne diru: ***_**Ju pli**_ *rapide vi revenos hejmen,* _**ju pli**_ *bone.** Diru: _**Ju pli**_ *rapide vi revenos hejmen,* _**des pli**_ *bone.* Kompreneble ankaŭ **des ... des** ne estas ebla.

Sed oni ja povas havi plurajn *ju*-esprimojn, kiuj kune regas unu aŭ plurajn *des*-esprimojn (aŭ simile): _**Ju pli**_ *zorge kaj* _**ju pli**_ *malrapide vi faros la laboron,* _**des pli**_ *kontenta kaj* _**des pli**_ *ĝoja mi fariĝos.*

## 17.5. *Kaj ... kaj*

Duobla aŭ plurobla *kaj* (§16.1) estas uzata por emfazi kaj insisti. Oni tiam metas *kaj* antaŭ ĉiuj kunligitaj aferoj, ankaŭ antaŭ la unua. Parole oni tiam normale emfaze akcentas je *kaj*:

- _**Kaj**_ *Petro* _**kaj**_ *Karlo laboras.* Insisto pri tio, ke ne nur unu sed fakte ambaŭ laboras.
- *Al tiu bona knabo* [...] *ni alportos* _**kaj**_ *frateton* _**kaj**_ *fratineton.* [FA1.210] Ordinare ili (la cikonioj) alportas frateton aŭ fratineton, sed ne ambaŭ.
- *Petro* _**kaj**_ *fumas* _**kaj**_ *drinkas.* Insisto, ke li fakte faras ambaŭ agojn.
- _**Kaj**_ *ilia amo,* _**kaj**_ *ilia malamo,* _**kaj**_ *ilia ĵaluzo jam de longe malaperis.* [Pr.9] Insisto, ke ĉiuj tri malaperis.
- *– Ĉu vi havas aŭton aŭ biciklon? –* _**Kaj, kaj**_. (= *Mi havas* _**kaj**_ *aŭton,* _**kaj**_ *biciklon.*)

## 17.6. *Nek ... nek*

Ordinara *nek* (§21) signifas "kaj ankaŭ ne", "kaj ankaŭ neniu" k.s. Duobla aŭ plurobla *nek* signifas "kaj ne". Kombinita *nek* estas do egala al *kaj ... kaj* (§17.5) plus neado:

- *Mi renkontis* _**nek**_ *lin,* _**nek**_ *lian fraton.* [FE.28] = *Mi kaj ne renkontis lin, kaj ne renkontis lian fraton.*
- _**Nek**_ *ĝojo,* _**nek**_ *malĝojo daŭras eterne.* [PE.393] = *Kaj ĝojo, kaj malĝojo ne daŭras eterne.*
- *Ŝi estis muta, povis* _**nek**_ *kanti* _**nek**_ *paroli.* [FA1.98] = *Ŝi kaj ne povis kanti, kaj ne povis paroli.*
- *Esperanto estas "nenies propraĵo",* _**nek**_ *en rilato materiala,* _**nek**_ *en rilato morala.* [OV.238] La neo validas kaj en rilato materiala, kaj en rilato morala.
- *– Ĉu vi havas aŭton aŭ biciklon? –* _**Nek, nek**_. (= *Mi havas* _**nek**_ *aŭton,* _**nek**_ *biciklon.*)

# 18. Ekkriaj vortetoj kaj sonimitoj

Ekkriaj vortetoj kaj sonimitoj troviĝas iom ekster la ordinara gramatiko. Ili ne interagas kun aliaj vortoj en frazo, sed estas ofte kiel kompleta eldiro en si mem.

Nur naŭ ekkriaj vortetoj estas oficialaj (§18.1). Plej multaj ekkriaj vortetoj estas neoficialaj (§18.3).

Multaj ekkriaj vortetoj ne havas firme difinitan signifon. Ekz. *he* (§18.1) kaj *ho* (§18.1) povas esti uzataj diversmaniere laŭ la momenta deziro de la uzanto.

Iuj kutimaj ekkriaj vortetoj ekuziĝis ankaŭ kiel ordinaraj radikoj, ekz. *adiaŭ* (§18.1) kaj *stop* (§18.3).

## 18.1. Oficialaj ekkriaj vortetoj

### *Adiaŭ*

*Adiaŭ* estas ĝentila salutvorto por disiĝoj (precipe kiam oni disiĝas por longa tempo aŭ eĉ por ĉiam): ***Adiaŭ**, kara hejma domo!* [Rt.122] ***Adiaŭ** por ĉiam!* [Rt.23]

*Adiaŭ* povas ankaŭ roli O-vortece. Tiam ĝi estas citaĵo (§36): *Por ĉiu okazo mi volas diri al vi porĉiaman **adiaŭ**.* [FA1.76]

*Adiaŭi* = "diri *adiaŭ!*" (aŭ alimaniere esprimi la saman ideon): *Ŝi **adiaŭis** lin per la mano, kaj malaperis.*

*Adiaŭo* = "eldiro de *adiaŭ!*" (aŭ esprimado de la ideo *adiaŭ!* en alia maniero): *Johano kapsignis al li **adiaŭon**.* [FA1.61]

*Adiaŭa* = "esprimanta adiaŭon, rilata al adiaŭo" k.s.: *Ĉi tiu saluto estis klare **adiaŭa**.* [M.180] *Morgaŭ estos la **adiaŭa** vespero.*

La vorto *adiaŭ* mem estas tre malmulte uzata en la praktiko. Kutime oni uzas la esprimojn *ĝis (la) revido!* kaj *ĝis (la)!* (§12.3.5.3), kiuj tamen esprimas, ke oni antaŭvidas rerenkontiĝi, eble eĉ baldaŭ. Kunmetaĵoj kiel *adiaŭi*, *adiaŭo* kaj *adiaŭa* estas tamen oftaj.

### *Bis*

*Bis* estas laŭda ekkrio, per kiu oni povas peti aktoron aŭ artiston ripeti ion bonan aŭ montri pli de sia arto. *Bis* ankaŭ povas esti uzata en instrukcioj pri kantado k.s. por montri ripetadon. *Bisi* = "krii *bis!*" (por peti ripeton). En iuj lingvoj *bis* havas pli vastan uzadon, sed en Esperanto ĝi (ankoraŭ) estas limigita al artistaj kaj muzikaj okazoj. En la praktiko tamen *bis* estas malofte uzata. Por laŭde peti aktoron aŭ artiston pri ripeto aŭ aldona prezento, oni uzas pli ofte esprimojn kiel *pli*, *plian*, *denove* aŭ ion similan.

### *Fi*

*Fi* montras malŝaton aŭ abomenon: ***Fi**, kiel abomene!* [FE.26] *"**Fi**!" li subite ekkriis, "la rozo estas ja difektita de vermo!"* [FA2.53] *Fi* baze estas vorteto (memstare uzebla ekkrie), sed ĝi estas pli ofte uzata prefiksece (§38.4.3) aŭ kiel ordinara radiko: *fia* = "malestiminda".

### *Ha*

*Ha* montras ekmiron aŭ surprizon: ***Ha**, kiel bele!* [FE.26] ***Ha**! kie vi ricevis la tutan monon?* [FA1.22] Ripeta *ha* povas esprimi pli vivan senton: *"**Ha ha**!" ekĝemis la malgranda Niko, vidante kiel la tuta manĝaĵo malaperas.* [FA1.15] Ripeta *ha* estas ankaŭ uzata kiel sonimito de ridado: *Kiel oni povas ne ridi!* [...] ***ha**, **ha**, **ha**!* [M.137]

*Ha* plus la neoficiala ekkria vorteto *lo* (§18.3) formas kune la duvortan ekkrion *ha lo*, kiu estas uzata kiel alvoko, precipe en telefonado.

### *He*

*He* estas uzata precipe por altiri ies atenton: ***He**, vi, venu ĉi tien!* [Rz.37] ***He**; kion vi tie havas en la sako?* [FA1.16] Komparu kun la neoficiala vorteto *hej* (§18.3).

### *Ho*

*Ho* estas ĝenerala ekkria vorteto por esprimi vivan senton: *"**Ho**, ĉielo!" ekkriis la patrino, "kion mi vidas?"* [FE.21] ***Ho** belega Italujo!* [FA1.142] ***Ho**! Diablo ĝin prenu!* [Rz.93] ***Ho**, Dio! kion vi faras!* [FE.26] ***Ho**, mia kor'!* [FK.303]

*Ho* estas uzata aparte ofte ĉe alvokoj por plivigligi aŭ pliseriozigi: *Al Vi, **ho** potenca, senkorpa Mistero* [FK.439] ***Ho** ve, sinjoro, mia patrino forpelis min el la domo.* [FE.21] *Ho* estas ofte kombinata kun aliaj ekkriaj vortetoj: *ho ve, he ho ...*

### *Hura*

Per *hura* oni esprimas ĝojon, aprobon, entuziasmon k.s.: *Ĉiuj aplaŭdis kaj laŭte aprobis, kaj Knut kriis "**hura**!"* [FA3.61] Legu ankaŭ pri la formo *hu ra*° en §18.4.

### *Nu*

*Nu* esprimas, ke sekvos io aparte atentinda. Ĝi estas uzata en multaj diversaj manieroj. Alvoko: *"**Nu**, mia filino?" — "Jes, patrino."* [FE.21] *"**Nu**, Alfred", ekkriis la doktoro, "kion Vi diros al tio ĉi?"* [BV.30] Malpacienco: ***Nu**, iru pli rapide!* [FE.26] ***Nu**, **nu** malsaĝulo, ĉesu!* [Rz.24] Konsento, koncedo: ***Nu**, bone, bone!* [Rt.12] ***Nu** do, venu, se vi vere insistas.* Fino de interparolo: ***Nu**, bone do, tial ni iru!* [Rt.30] ***Nu**, bonan nokton!* [H.2] Surpriziĝo: ***Nu**! Kiu supozus ion tian? **Nu**, mi neniam atendis tion!* Dubo, hezito: ***Nu**, kiel nun, Anton Antonoviĉ?* [Rz.15] Klarigo: ***Nu**! Tion kaŭzis difekto en la hejtilo.* Rezignacio: ***Nu**, tia estas la vivo. **Nu**, kion fari?* Konsolo: ***Nu, nu**! Ne ploru!*

### *Ve*

Per *ve* oni esprimas kordoloron aŭ bedaŭregon pro malfeliĉo: *"Ho **ve**, sinjoro, mia patrino forpelis min el la domo".* [FE.21] *Ho **ve** al ni, ke ni pekis!* [Pk.5] ***Ve, ve, ve**! Ni estas kaptitaj, radŝiritaj, kvaronigitaj!* [Rt.66] *Ve* povas ankaŭ montri minacon al alia persono: *Tiam **ve** al vi estos, se vi movos viajn ŝultrojn aŭ faros malkontentan mienon.* [Rt.41] *"**Ve** estas"* [...] *"al la viro, se virino kuraĝas lin kritiki."* [Gm.52] *Veo* = "plenda ekkrio", *hejmveo* = "nostalgio (pri la hejmloko)", *ve(ad)i* = "plende kri(ad)i, lamenti".

## 18.2. Ordinaraj radikoj kiel ekkriaj vortetoj kaj sonimitoj

Iafoje oni uzas ordinarajn radikojn (§37.1) sen finaĵoj kiel ekkriajn vortojn:

- ***Halt'**! Ne kuraĝu permesi al vi!* [Rt.142] *= Haltu! Ne kuraĝu ...* HALT estas ordinara radiko normale uzata kiel verbo: *halti*. Ĉi tie Zamenhof uzis ĝin kiel ekkrian vorton, kaj skribis apostrofon, kvazaŭ temus pri ellasita O-finaĵo. Pli bone estas skribi *halt!* (sen apostrofo), ĉar temas pri ekkria uzo de nuda radiko.
- ***Ek**! Ni komencu! **Ek**! Antaŭen!* La prefikso EK (§38.3.4) estas tre ofte uzata kiel memstara ekkria vorto por instigi al (tuja) ekagado.
- ***Eks** pri tiuj idiotoj!* La prefikso EKS (§38.3.5) estas iafoje uzata kiel memstara ekkria vorto por montri, ke io (ĝena), kio antaŭe ekzistis, ne plu okazos aŭ aperos.
- ***Help**! = Helpu! Helpon!*

Povas ekesti problemoj pri akcento en ĉi tia uzado de nudaj radikoj. Kie en ekz. *Rapid!* meti akcenton? Ĉu oni diru *"rapíd"* (kvazaŭ estus *Rapid'!* kun apostrofo), aŭ *"rápid"* (akcentante la antaŭlastan vokalon)? Estas konsilinde uzi kiel ekkriajn vortojn nur unuvokalajn radikojn, ĉar tiam ne povas ekesti dubo pri la akcento. Estas eĉ konsilinde uzi tiun ĉi eblon ĝenerale tre ŝpare.

Multaj radikoj estas iom sonimitaj. Ofte oni kreas el ili sonimitajn vortojn per forigo de finaĵoj, kaj ofte per mallongigo kaj aliformigo:

- *Kraki → Krak!* [FA3.86]
- *Plaŭdi → Plaŭ!* [FA2.35]
- *Rapidi → Rap, rap! Rapidu, rapidu!* [FA2.34]
- *Pafi → "Pif, paf!" eksonis subite krakoj.* [FA2.37]
- *Murmuri → Mur-mur-mur!* [FA2.128]
- *Boji → Boj!*
- *Miaŭi → Miaŭ!* (eble pli bone *mjaŭ*, §18.4)
- *Tranĉi → Trinĉ tranĉ!*
- *Gluti → Glut! glut!*
- *Tinti → Tin tin!*

## 18.3. Neoficialaj ekkriaj vortetoj kaj sonimitoj

Da neoficialaj ekkriaj vortetoj kaj sonimitoj ekzistas tre multe. Efektive oni povas tiajn "vortojn" libere krei laŭ momentaj bezonoj. La signifoklarigojn, kiujn oni trovas en vortaroj kaj ĉi tie, oni ne prenu tro serioze. La efektivaj signifoj tre dependas de la uzanto kaj de la situacio. Ĉi tie nur mallonge menciiĝos kelkaj ekzemploj de neoficialaj ekkriaj vortetoj (pliajn oni povas trovi ekz. en *PIV*). Rimarku, ke la formoj kaj la signifoj de tiaj vortoj povas tre varii en la praktiko..

Sonimitoj estas la plej "sovaĝa" parto de ĉiu lingvo. Sonimitojn oni povas krei tute laŭplaĉe kaj laŭbezone. Pri ili ne validas gramatikaj reguloj. Ili ankaŭ ne ĉiam obeas al la sonreguloj. Ĉi-poste oni povas rimarki ekz. *sss* kun tri sinsekvaj "s"-oj, kio ne estas ebla en normalaj vortoj, kaj ankaŭ *ŭa* kaj *kŭaks*, en kiuj la litero Ŭ aperas en nenormala pozicio (§2.1).

- *lo* = alvoko, normale uzata nur kune kun *ha* en la duvorta alvoko *ha lo* (§18.1)
- *hola* = alvoko
- *stop* = "haltu!" (→ *stopi* = "haltigi")
- *hoj* = alvoko de malproksime
- *hej* = kuraĝigo, instigo al gajo
- *hop* = instigo al salto (→ *hopi* = "salti per nur unu piedo")
- *aha* = konstato (de io atendata aŭ suspektata)
- *ehe* = ekkompreno
- *oho* = surpriziĝo
- *aĥ* = forta surprizo aŭ bedaŭro
- *aj*, *aŭ* = doloro
- *ba*, *baf* = malŝata senzorgeco
- *be* = 1. konfuziteco. 2. bleko de ŝafo
- *oj* = 1. amara bedaŭro. 2. doloro
- *o kej°* = konsento, bone!
- *hm* = 1. paŭzo por pripensi, necerteco, konfuziteco. 2. kontraŭdiremo, ĝenateco. 3. ŝajnigo de tuseto
- *fu* = 1. detenata rido. 2. = *uf*
- *uf* = faciliĝo post laceco, penado k.s.
- *ŭa* = 1. krio de bebo. 2. bojo de hundo
- *amen*, *haleluja*, *hosana* = religiaj ekkriaj vortetoj uzataj en judismo kaj kristanismo
- *hot*, *hoto* = instigo al ĉevalo iri, al bovo forkuri k.s.
- *huŝ*, *tju* = fortimigo de bestoj
- *gik gak* = bleko de anaso
- *hu* = ektimo

- *hu ha* = tre forta ekscitiĝo
- *hu hu* = bleko de strigo
- *kluk kluk* = bleko de kokino
- *kŭaks*, *brekekekeks*° = bleko de bufo
- *kva*, *kvak* = bleko de rano
- *kvivit* = birda pepado
- *glu glu glu* = bleko de meleagro
- *glu glu*°, *kluk kluk*° = sono de akvo elfluanta el botelo
- *puf*, *pum* = bruo de falo k.s.
- *sss* = sibla sono
- *tik tak*° = sono de meĥanika horloĝo

## 18.4. Elparolado kaj skribado de ekkriaj vortetoj kaj sonimitoj

Ekkriaj kaj sonimitaj vortetoj estas ofte elparolataj kun alia akcento ol ili devus havi laŭ la skribo. Tiaj ĉi vortoj estas la plej "sovaĝa" parto de la lingvo, kaj tial la normalaj reguloj de skribo (§1) kaj elparolo (§2) eble ne estas same gravaj kiel ĉe ordinaraj vortoj, sed plej ofte oni tute bone povas skribi regule laŭ la efektiva elparolo:

- La duvorta alvoko *ha lo* (§18.1) estas ofte misskribata **halo**, kio devus elparoliĝi **h**á**lo** (same kiel la O-vorto *halo*). *Ha lo* estas tamen ĉiam elparolata *"ha l***ó***"*. Ankaŭ ne estas ĝuste skribi **halo'** kun apostrofo, ĉar ĝi neniel estas O-vorto.
- La vorton *hura* (§18.1) oni elparolu "h**ú**ra" (akcento je U). Sed multaj elparolas "hur**á**". Se oni tiel elparolas, oni skribu *hu ra*°.
- *Hola* (§18.3) estas ofte elparolata "hol**á**", kaj devas tiam esti skribata *ho la*°.
- *Aha* (§18.3), *ehe* (§18.3) kaj *oho* (§18.3) elparoliĝu "**á**ha", "**é**he" kaj "**ó**ho". Ili estas tamen ofte elparolataj "ah**á**", "eh**é**" kaj "oh**ó**", kaj devas tiam esti skribataj *a ha*°, *e he*° kaj *o ho*°.
- *O kej*° (§18.3) estas ofte misskribata **okej**, kio devus elparoliĝi "**ó**kej". La efektiva elparolo estas tamen ĉiam "ok**é**j". Iuj proponis skribi **okej'** kun apostrofo, sed ja neniel temas pri O-vorto.
- La kata bleko *miaŭ* (§18.2) estas ofte elparolata "mi**á**ŭ", kaj tiam *mjaŭ*° estas pli bona skribo.

# 19. Neoficialaj vortetoj

Krom la oficialaj vortetoj (§3.1) ekzistas ankaŭ neoficialaj vortetoj. Iuj estas tute akceptitaj vortoj, dum aliaj estas novaĵoj, kiujn oni nepre evitu.

## Neoficialaj rolvortetoj

Okazis provoj enkonduki novajn rolvortetojn en Esperanton, sed tio estas nur malfacile ebla (same kiel en aliaj lingvoj). Jen sekvas tamen klarigoj de kelkaj neoficialaj rolvortetoj, kiujn oni povas de tempo al tempo renkonti:

### *Cis*

*Cis* = "sur tiu ĉi flanko de, maltrans": *Ili loĝas **cis tiuj montoj**. = Ili loĝas sur tiu ĉi flanko de tiuj montoj (proksime de ni).* La rolvorteto *cis* estas malmulte uzata en la praktiko. Oni diru *ĉi-flanke de*, *sur tiu ĉi flanko de* aŭ eventuale *maltrans*. Teorie oni povus uzi direktan N-finaĵon post *cis*, same kiel post *trans*: *La malamika armeo venis **cis la limriveron**. = ... sur nian flankon de la limrivero.*

*Cis* estas pli ofta en vortfarado: *cisalpa* = "ĉi-flanka de la Alpoj", *cisdanube* = "ĉi-flanke de Danubo", *Cisganga Hindujo* = "tiu parto de Hindujo, kiu estas okcidente de la rivero Gango" (la nomoj *Cisganga Hindujo* kaj *Transganga Hindujo* montras eŭropan perspektivon, sed Esperanto estas tutmonda lingvo, kaj oni ordinare evitu tiajn vortojn). *Cis* ankaŭ troviĝas en propraj nomoj kaj sciencaj vortoj, kie oni prefere rigardu ĝin kiel parton de la radiko. Tiaj vortoj normale kontrastas al simila formo kun "trans": *Ciskejo – Transkejo* (bantuaj hejmlandoj en Sud-Afriko, kiuj troviĝas respektive sude kaj norde de la rivero Granda Kejo), *cisbuteno – transbuteno* (ĥemiaj kombinaĵoj, kiuj havas certajn elementojn respektive samflanke kaj malsamflanke de centra strukturo).

### **Far*

**Far** estas uzata de iuj esperantistoj anstataŭ *de* (§12.3.2) por montri aganton ĉe agaj O-vortoj (§12.3.2.2) aŭ ĉe pasivaj participoj (§12.3.2.4): *Morgaŭ okazos <u>akcepto</u> **de** la urbestro.* → **Morgaŭ okazos <u>akcepto</u> **far** la urbestro.** *Ŝi estas <u>amata</u> **de** ĉiuj.* [FG.54] → **Ŝi estas <u>amata</u> **far** ĉiuj.**

*De* havas multajn signifojn (§12.3.2), kaj iafoje konfuzo efektive povas estiĝi. Tiam oni normale uzas *fare de* por klare montri, ke temas pri aganto (senca subjekto): *Morgaŭ okazos <u>akcepto</u> **fare de** la urbestro. Mi legis la <u>tradukon</u> de Hamleto **fare de** Zamenhof.* Iuj opinias, ke *fare de* estas tro longa, kaj tial mallongigas ĝin al **far**.

Laŭ la *Fundamento*, en pasivo la rolmontrilo de aganto estas *de* (§40). **Far** estus do rekte erara ĉe pasiva participo. (Aldono de *fare* ĉe pasiva participo ne estas eraro, sed estas preskaŭ ĉiam superflua.) Rilate al agaj O-vortoj **far** ne estas rekte erara, sed tamen superflua kaj evitinda aldonaĵo al la lingvo. La okazoj, kiam *de* efektive povas kaŭzi malklarecon, estas tre maloftaj. En tiuj maloftaj okazoj oni uzu por montri aganton la esprimon *fare de*, kiu estas klara, preciza kaj komprenebla por ĉiuj esperantistoj. Ĝuste ĉar *fare de* estas tiel malofte bezonata, ĝi ne estas tro longa.

### *Fri*

*Fri* estas komerca fakvorto. Ĝi montras, ke prezo aŭ pago inkluzivas ion, ekz. transporton al certa loko: *La prezo estas mil dolaroj **fri haveno**. = ... inkluzive pagon por transporto ĝis haveno. La prezo estas mil dolaroj **fri dogano**. = ... inkluzive kostojn por dogano. Fri* estas uzata nur en faka lingvaĵo. En ordinara lingvaĵo oni prefere montru la signifon klare per pluraj vortoj.

### **Graŭ*°*

El la rolvorteto *malgraŭ* (§12.3.6.6) oni plurfoje proponis krei la vorteton ***graŭ**°* = “mal-malgraŭ” (kvazaŭ *malgraŭ* havus la prefikson MAL). **Graŭ*°* povus signifi ekz. “dank’ al”, sed ĝi ne estas praktike uzata.

### **Na*°*

**Na*°* estas eksperimenta rolvorteto, kiu montras rektan objekton. La intenco estas, ke oni uzu **na** en tiaj okazoj, en kiuj estas malfacile, nekonvene aŭ eĉ neeble uzi la ordinaran objektan finaĵon N (§12.2.2). Tiuj, kiuj uzas **na**, uzas ĝin precipe antaŭ ne-Esperantaj propraj nomoj kaj ali-specaj fremdaj vortoj. Oni uzas **na** ankaŭ antaŭ mallongigoj, citaĵoj kaj Esperantaj vortetoj, kiuj ne akceptas N-finaĵon: **Por tekstoredaktado Unikode kaŭ Esperante, mi rekomendas **na** <u>UniRed</u>.* *Multaj jam konas **na** <u>babilejo.org</u>.* *Tion mi konfirmis konsultante **na** <u>PIV</u>.* *La ĉina nomo de Esperanto signifas **na** <u>“mondlingvo”</u>.* *Mi ŝatas **na** <u>ambaŭ</u>.* *Tiom da homoj faras **na** <u>tiom da strangaĵoj</u>.* ***Na** <u>pli da informoj</u> oni povas trovi tie.** La precizaj manieroj uzi **na** tre varias. Ĉiuokaze **na** estas reform-propono evitenda. Komparu kun simila uzo de *je* (§12.3.1).

## Diversaj neoficialaj vortetoj

Iafoje oni renkontas la sekse neŭtralan triapersonan homan pronomon ***ri***° (§11.5). Iuj eĉ elpensis la apenaŭ uzatan inan multe-nombran pronomon **iŝi*°*, kiu do estas ina versio de *ili* (§11.5), kiu tamen ne estas vira, sed ĉiam sekse neŭtrala.

Oni proponis kaj ankaŭ iomete ekuzis ***sepen*** kaj ***sis***° (§23.1.1) anstataŭ la nombraj vortetoj *sep* kaj *ses*.

Iafoje oni renkontas la **neoficialajn tabelvortojn** **alio*°*, **aliu*°*, **alia*°*, **aliel**, **alie*°*, **aliam*°*, **aliom*°*, **alial*°* kaj **alies**. Ili estas eraraj kaj nepre evitendaj: §13.3.

Por distingi unu specialan sencon de la tabelvorto *kiel*, oni proponis la tabelvortecan vorton ***estiel*** (§20.1.3). Ĝi apenaŭ estas uzata.

Anstataŭ la kunmetita vorteto *malpli* estas proponita la vorteto ***men***, kiu iel troviĝas kaŝite en la vorteto *almenaŭ* (§14.3.5), sed **men** ne enuziĝis. Ankaŭ aperis diversaj proponoj por anstataŭi *malplej*, kiuj ĉiuj same mal-sukcesis. Oni restu ĉe la klaraj *malpli* kaj *malplej* (§14.3.15).

Anstataŭ *supren* kaj *malsupren* Zamenhof iam proponis la vortetojn ***sor*** kaj ***sob***. Kiel vortetoj ili estas uzataj nur iafoje en (eksperimenta) poezio. SOR tamen enuziĝis anstataŭe kiel ordinara radiko: *sori* = “suprenflugi”.

Anstataŭ la esprimo *kaj/aŭ* (§16.2) estas proponita la vorteto ***kaŭ**°*. Ĝi ne fariĝis ĝenerale uzata.

La respondvorto ***nen*** estas proponita kiel alternativo, kiam ordinara *ne* (§22.4) povus esti malklara. **Nen** tamen tute ne estas uzata.

Krome ekzistas multegaj **neoficialaj ekkriaj vortetoj** (§18.3).

Iuj verkistoj proponadas novajn vortetojn kvazaŭ industrie. Ili ne komprenas, ke vortetoj nur esceptokaze enuziĝas en la lingvon. Ne multe gravas, ĉu proponata vorteto estas teorie bona aŭ ne. Plej verŝajne ĝi ĉiuokaze ne populariĝos.

## Nomoj de fremdaj literoj

Por unuj fremdaj literoj oni ĉiam uzas plene esperantigitajn nomojn, ekz. Y = *ipsilono*, kaj X = *ikso* (§1.2). Sed multaj aliaj estas kutime nomataj per nur duone esperantigitaj nomoj. Tiajn nomojn oni devas rigardi kiel O-vortecajn vortetojn.

### Grekaj literoj

La grekaj literoj nomiĝas: *alfa*, *beta*, *gama*, *delta*, *epsilon*°, *zeta*, *eta*, *teta*, *jota*, *kapa*, *lambda*, *mu*, *nu*, *ksi*, *omikron*°, *pi*, *rota*, *sigma*, *taŭ*, *upsilon*°, *fi*, *ĥi*, *psi*, *omega* (ankaŭ aliaj variantoj ekzistas). Oni ankaŭ povas ilin plene esperantigi kun O-finaĵoj, ekz.: *alfo*°, *beto*°, *gamo*°, *delto*, *epsilono*, *zeto*°, *eto*°, *teto*°, *joto*, *kapo*°, *lambdo*, *muo*°, *nuo*°, *ksio*°, *omikrono*°, *pio*°, *roto*°, *sigmo*°, *taŭo*°, *upsilono*°, *fio*°, *ĥio*°, *psio*°, *omego*.

### Hebreaj literoj

La hebreaj literoj nomiĝas: *alef*°, *bet*°, *gimel*°, *dalet*°, *he*°, *vav*°, *zain*°, *ĥet*°, *tet*°, *jod*°, *kaf*°, *lamed*°, *mem*°, *nun*°, *sameĥ*°, *ain*°, *pe*°, *cadi*°, *kof*°, *reŝ*°, *ŝin*°, *tav*°.

**Noto:** En matematiko *alef* estas uzata kiel simbolo por transfiniaj kvantonombroj: *alef nul*, *alef unu*, *alef du* k.t.p.

## Tononomoj

Tiel nomataj solfeĝaj tononomoj estas senfinaĵaj vortetoj: *do*, *re*, *mi*, *fa*, *sol*, *la*, *si*. Estas rekomendinde uzi en Esperanto ĉefe la alfabetan sistemon de tononomoj: *A*, *B*, *C*, *D*, *E*, *F*, *G*, ĉar ĝi estas pli facile lernebla. La solfeĝaj tononomoj povas tamen esti utilaj en kantekzercado kaj simile. Kelkaj lingvoj uzas la tononomon *H* anstataŭ *B* (kaj *B* anstataŭ *B bemola*). En Esperanto oni prefere uzu la pli logikan sistemon kun *B* kaj *B bemola*. Ekzistas ankaŭ specialaj nomoj por bemolaj kaj diesaj tonoj: **As**°, **Ais**°, **Bes**°, **Bis**°, **Ces**°, **Cis**°, **Des**°, **Dis**°, **Es**°, **Eis**°, **Fes**°, **Fis**°, **Ges**°, **Gis**°. Estas pli bone uzi la nomojn *A bemola*, *A diesa*, *B bemola*, *B diesa* k.t.p. Je bezono oni povas mallongigi al *A be*°, *A di*°, *B be*°, *B di*° k.t.p.

## Ne-esperantigitaj nomoj

Propraj nomoj (kaj aliaj fremdaj vortoj), kiuj ne estas plene esperantigitaj (§35.2) iasence estas neoficialaj O-vortecaj vortetoj, ĉar ili povas roli O-

vortece sen O-finaĵo, sed praktike ili pli similas al ordinaraj radikoj, ĉar temas pri tute malfermita klaso de vortoj.

# 20. Komparaj esprimoj

## 20.1. *Kiel* kaj *ol*

Per la vortetoj *kiel* kaj *ol* oni povas montri, kun kio oni komparas. En tia uzado *kiel* kaj *ol* similas al rolvortetoj (§12.3), sed ankaŭ al frazenkondukaj vortetoj (§33.1). Oni povas diri, ke ili formas propran vortkategorion: **komparaj vortetoj**.

Per *kiel* oni faras **egalecajn komparojn**, kiuj montras, al kio io similas. Kompara *kiel* kunlaboras kun *tiel*, *same*, *simile*, *tiom*, *tia*, *sama*, aŭ *simila*. Sed ofte *tiel* aŭ *tia* estas subkomprenata.

Per *ol* oni faras **malegalecajn komparojn**, kiuj montras, al kio io malsimilas. Kompara *ol* kunlaboras kun *pli* (§14.3.15), *malpli*, *alie*, *malsame*, *alia*, *malsama* aŭ kunmetaĵoj kiel *alimaniere*, *aliloke*, *alispeca* k.s.

*Kiel* havas ankaŭ aliajn nekomparajn uzojn: §14.3.2.

Iafoje oni uzas *malkiel* por malegalecaj komparoj (§14.3.2).

Legu ankaŭ pri *pli ol* antaŭ nombraj kaj kvantaj vortoj en §23.6, kaj pri *antaŭ ol* en §33.7.

### 20.1.1. Uzado de *kiel* kaj *ol*

Baze *kiel* kaj *ol* estas frazenkondukiloj. Tio signifas, ke ili enkondukas subfrazon (§33). Sed ofte post kompara *kiel* aŭ *ol* estas nur sola frazparto (aŭ kelkaj frazpartoj): *kiel homo*, *kiel vi*, *kiel hieraŭ*, *kiel en la sudo*, *ol besto*, *ol mi*, *ol hodiaŭ*, *ol en la nordo*. Tiuj ĉi klarigoj pri komparaj *kiel* kaj *ol* temas precipe pri tia uzo.

Komparaj *kiel* kaj *ol* povas enkonduki diversspecajn frazpartojn: O-vortojn, pronomojn, E-vortojn, E-vortecajn vortetojn, I-verbojn k.a.

Por klarigi la sencon de kompara esprimo oni povas vastigi ĝin al plena subfrazo kun ĉefverbo, aŭ al esprimo kun I-verbo, aŭ al pli longa frazparto. Klariga formo, kiu anstataŭas komparan *ol*-esprimon, mem komenciĝas per *ol*. Klariga formo, kiu anstataŭas komparan *kiel*-esprimon, plej ofte komenciĝas per *kiel*. Sed iafoje pro la celita senco la klariga formo anstataŭe povas aŭ devas komenciĝi per alia KI-vorto. Kiam la kompara esprimo kunlaboras kun *tia* aŭ *tia sama* aŭ *sama* kun eca senco, la plena subfrazo komenciĝas per *kia*. Kiam kompara *kiel*-esprimo kunlaboras kun *sama* kun identiga senco, oni povas klarigi per subfrazo, kiu komenciĝas per *kiu*. Kiam kompara *kiel* rilatas al *tiom* aŭ alia kvanta esprimo, tia klariga plena subfrazo povas komenciĝi per *kiom* anstataŭ *kiel*.

Komparaj esprimoj kun *kiel* aŭ *ol* povas esti **rektaj** aŭ **subkomprenaj**:

#### Rektaj komparoj

En **rektaj komparoj** tio, kun kio oni komparas, efektive aperas post *kiel* aŭ *ol* en la kompara esprimo. Se oni klarige vastigas rektan komparon, oni uzas ĉiam la verbon *esti*:

- *Tiu ĉi malfreŝa pano estas* [tiel] *malmola, **kiel ŝtono**.* [FE.33] = *Tiu ĉi malfreŝa pano estas tiel malmola, **kiel ŝtono estas malmola**.* Oni komparas panon kun ŝtono.
- *Ŝiaj okuloj estis* [tiaj] ***kiel du steloj**.* [FA1.234] = *Ŝiaj okuloj estis tiaj, **kiaj estas du steloj**.* La klariga subfrazo uzas *kia*, ĉar la kompara esprimo kunlaboras kun subkomprenata *tia*.
- *Lakto estas pli nutra, **ol vino**.* [FE.10] = *Lakto estas pli nutra, **ol vino estas nutra**.* Oni komparas lakton kun vino.
- *Por li delogi knabinon estas **kiel krevigi nukson**.* [M.153] = *... estas tiel, **kiel estas krevigi nukson**.* Oni komparas delogadon de knabino kun krevigado de nukso.

Ne malofte la klariga vastigo de rekta komparo estas iom nenature pedanta. Oni apenaŭ uzas tiajn longajn esprimojn en ordinara lingvaĵo, sed praktike nur la simplajn komparajn esprimojn.

## Subkomprenaj komparoj

En **subkomprenaj komparoj** la komparaĵo ne aperas mem en la kompara esprimo, sed estas tie nur subkomprenata. Anstataŭe post *kiel* aŭ *ol* aperas io, kio rilatas al la komparaĵo. Se oni klarige vastigas subkomprenan komparon, la subkomprenata komparaĵo ja aperas. En la vastigita versio oni ordinare uzas tiun saman verbon, al kiu rilatas la kompara esprimo (ne ĉiam *esti*, kiel ĉe rektaj komparoj):

- *Ili kondutas (tiel) **kiel homoj**.* → *Ili kondutas tiel, **kiel kondutas homoj**.* La kompara esprimo *kiel homoj* kunlaboras kun la vorteto *tiel*. Tiu vorteto estas komplemento de la verbo *kondutas*. Sekve oni komparas du kondutojn. Sed la verbo *konduti* ne ĉeestas en la kompara esprimo *kiel homoj*. Sekve la komparo estas subkomprena. En la klariga formo kun plena subfrazo la verbo *kondutas* estas aldonita. La vorteton *tiel* oni preskaŭ ĉiam ellasas en tiaj ĉi frazoj: *Ili kondutas kiel homoj.* Ankaŭ en la subfraza formo oni povas ellasi ĝin: *Ili kondutas, kiel kondutas homoj.*
- *Li legas la saman libron **kiel mi**.* → *Li legas la saman libron, **kiel la libro, kiun legas mi**.* La kompara esprimo *kiel mi* kunlaboras kun la vorto *sama*, kiu estas rekta priskribo de la vorto *libron*. Sekve oni komparas librojn en egaleca maniero (ili estas fakte unu sama libro). En la vastigita formo la frazparto *la libro* estas aldonita.
- *Emilio havis sur si eĉ la saman veston **kiel tiam**.* [M.106] = *... la saman veston, **kiun ŝi havis tiam**.* La klariga subfrazo uzas *kiu*, ĉar la kompara esprimo kunlaboras kun la A-vorto *saman*.
- *Jen ŝi staras antaŭ ni* [...] *kun tiom da sapo sur la brilanta vizaĝo, **kiel antaŭe**.* [BV.79] = *... kun tiom da sapo sur la brilanta vizaĝo, **kiom (aŭ kiel) ŝi havis antaŭe sur la vizaĝo**.*
- *Legomojn mi manĝas pli ofte **ol viandon**.* → *Legomojn mi manĝas pli ofte, **ol mi manĝas viandon**.* La kompara esprimo *ol viandon* kunlaboras kun *pli ofte*, kiu estas komplemento de la verbo *manĝas*. Sekve oni komparas laŭ la ofteco manĝadon de legomoj kun manĝado de viando.

En la kompara esprimo mankas la komparata ago *manĝi*. En la vastigita formo *manĝas* ja aperas.

- *Mia frato loĝas en alia lando* ***ol mia fratino****. → Mia frato loĝas en alia lando,* ***ol la lando, en kiu loĝas mia fratino***. La kompara esprimo *ol mia fratino* kunlaboras kun la vorto *alia*, kiu estas rekta priskribo de *lando*. Oni do komparas du landojn.
- *Ŝi estis ankoraŭ pli bela* ***ol antaŭe****.* FA1.80 *= ... pli bela,* ***ol ŝi estis antaŭe***. Oni komparas ŝin kun ŝi mem en du malsamaj tempoj.
- *Ni forflugos* [...] *al la varmaj landoj, kie la suno lumas pli bele* ***ol ĉi tie****.* FA1.50 *= ... pli bele,* ***ol ĝi lumas ĉi tie****.*

### 20.1.2. *Kiel* kaj *ol* kune kun rolmontriloj

Ofte oni devas uzi rolmontrilon (N-finaĵon aŭ rolvorteton) en kompara esprimo kun *kiel* aŭ *ol*. Ĝenerale oni uzu rolmontrilon, se estas rolmontrilo en la plena subfrazo, al kiu respondas la kompara esprimo. Iafoje oni povas diversmaniere vortumi la klarigan esprimon sen ŝanĝi la efektivan sencon, kaj tiam povas esti same bone uzi aŭ ne uzi rolmontrilon.

#### Komparoj kun *kiel*

- *Karlo uzas siajn manojn* ***kiel magiisto****. = Karlo uzas siajn manojn tiel, kiel magiisto uzas siajn manojn.* En la plena subfrazo la vorto *magiisto* estas subjekto, kaj tial ne havas rolmontrilon. Sekve ankaŭ en la simpla kompara *kiel*-esprimo estu *kiel magiisto* sen rolmontrilo.
- *Karlo uzas sian manon* ***kiel martelon****. = Karlo uzas sian manon tiel, kiel oni uzas martelon.* En la plena subfrazo la vorto *martelon* estas objekto, kaj havas tial N-finaĵon. Sekve ankaŭ en la simpla kompara *kiel*-esprimo estu *kiel martelon* kun N-finaĵo.
- *Karlo batas per sia mano* ***kiel per martelo****. = Karlo batas per sia mano tiel, kiel oni batas per martelo.* En la plena subfrazo la vorto *martelo* estas ila komplemento, kaj tial havas la rolvorteton *per*. Sekve ankaŭ en la simpla kompara *kiel*-esprimo estu *kiel per martelo*.
- *Vin solan mi fidis,* ***kiel honesta homo****. = ... tiel, kiel honesta homo fidas.* La efektiva senco tamen povas esti pli proksima al: *... ĉar mi estas honesta homo.* Vidu ĉi-poste la klarigojn pri *kiel* por rolo, funkcio k.s. (§20.1.3)
- *Vin solan mi fidis,* ***kiel honestan homon****.* Rz.38 *= ... tiel, kiel oni fidas honestan homon.* La efektiva senco tamen povas esti pli proksima al: *... ĉar vi estas honesta homo.*
- *La* [...] *vortojn kun "um" oni devas lerni,* ***kiel simplajn vortojn****.* FE.42 *= ... lerni tiel, kiel oni lernas simplajn vortojn.*
- *Ĉu estas permesite agi kun nia fratino* ***kiel kun publikulino****?* Gn.34 *= ... tiel, kiel oni agas kun publikulino.*
- *La kovrilpaĝo de via revuo baldaŭ atingos simile altan nivelon* ***kiel la ceteraj paĝoj****. = ... simile altan nivelon kiel tiu nivelo, kiun atingis la ceteraj paĝoj.*

- *Ĝia uzado estas tia sama* ***kiel en la aliaj lingvoj****.* [FE.27] *= ... tia sama, kia ĝi estas en la aliaj lingvoj.*
- *Ĝiaj kolonoj kaj portikoj havis la saman mezuron,* ***kiel ĉe la unua pordego****.* [Jĥ.40] *= ... la saman mezuron, kiun havis la kolonoj kaj portikoj ĉe la unua pordego.* Se oni diras anstataŭe *kiel la unua pordego*, la senco fariĝas alia, = *... la saman mezuron, kiun havis la unua pordego.*
- *Ĝi havas du okulojn tiel grandajn,* ***kiel du tasoj****.* [FA1.5] *= ... tiel grandajn, kiel du tasoj estas grandaj.*
- *Viandon li donas al mi tiel malmolan* ***kiel trabo****.* [Rz.29] *= ... tiel malmolan, kiel trabo estas malmola.*
- *Li posedis du okulojn* [tiel] *klarajn kaj helajn* ***kiel profunda akvo****.* [FA4.210] *= ... tiel klarajn kaj helajn, kiel profunda akvo estas klara kaj hela.* Se oni diras *kiel profundan akvon*, la senco ŝanĝiĝas: *= ... tiel, kiel li/oni posedas profundan akvon.*
- *Skulptu al vi du ŝtonajn tabelojn* [tiajn] ***kiel la unuaj*** **[tabeloj]**. [Er.34] *= ... du ŝtonajn tabelojn tiajn, kiaj estis la unuaj tabeloj.* Se oni diras *kiel la unuajn*, la senco fariĝas alia: *... tiamaniere, kiel vi skulptis la unuajn tabelojn.*
- *Ŝi manĝas tropikajn fruktojn (tiajn)* ***kiel mangoj kaj ananasoj****. = Ŝi manĝas tropikajn fruktojn tiajn, kiaj estas mangoj kaj ananasoj.* Mangoj kaj ananasoj estas ekzemploj de tiu speco de fruktoj, kiujn ŝi manĝas. Povas esti, ke ŝi ne manĝas ĝuste tiujn du fruktojn. Sed ankaŭ *kiel mangojn kaj ananasojn* esta ebla. Tiam la senco estas maniera: *Ŝi manĝas tropikajn fruktojn tiamaniere, kiel oni/ŝi manĝas mangojn kaj ananasojn.*
- *Mi faros vian ĉielon* [tia] ***kiel fero*** *kaj vian teron* [tia] ***kiel kupro****.* [Lv.26] *= ... tia, kia estas fero ... tia, kia estas kupro.*

## Komparoj kun *ol*

- *Elizabeto batas la najlon pli forte* ***ol Sofio****. = Elizabeto batas la najlon pli forte, ol Sofio batas la najlon.* En la plena subfrazo la vorto *Sofio* estas subjekto, kaj tial ne havas rolmontrilon. Sekve ankaŭ en la simpla kompara *ol*-esprimo estu *kiel Sofio* sen rolmontrilo.
- *Elizabeto batas la najlon pli forte* ***ol Sofion****. = Elizabeto batas la najlon pli forte, ol ŝi batas Sofion.* En la plena subfrazo la vorto *Sofion* estas objekto, kaj havas tial N-finaĵon. Sekve ankaŭ en la simpla kompara *ol*-esprimo estu *kiel Sofion* kun N-finaĵo.
- *Elizabeto batas la najlon pli forte per martelo* ***ol per ŝtono****. = Elizabeto batas la najlon pli forte per martelo, ol ŝi batas ĝin per ŝtono.* En la plena subfrazo la vorto *ŝtono* estas ila komplemento, kaj tial havas la rolvorteton *per*. Sekve ankaŭ en la simpla kompara *ol*-esprimo estu *ol per ŝtono*.
- *Li amos sian landon pli* ***ol ĉiuj aliaj landoj****. = ... pli ol ĉiuj aliaj landoj amos lian landon.*

- *Li amos sian landon pli **ol ĉiujn aliajn landojn**.* [L1.201] *= ... pli ol li amos ĉiujn aliajn landojn.*
- *Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, **ol sin mem**.* [FE.18] *= ... amas lin pli, ol li amas sin mem.*
- *Tie la suno lumis multe pli hele **ol ĉe ni**.* [FA1.51] *= ... pli hele ol ĝi lumas ĉe ni.*
- *Lecionojn li ŝatis pli **ol promeni en la arbaro**.* La *ol*-esprimo laŭsence estas objekto, sed ĝia ĉefvorto, *promeni*, ne akceptas N-finaĵon. Se oni anstataŭe uzas O-vorton, ĝi devas havi N-finaĵon: *Lecionojn li ŝatis pli **ol (li ŝatis) promenadon en la arbaro**.*
- *En la sekvanta semajno la knabineto la unuan fojon sidis pli **ol tutan horon**.* [FA3.69] *= ... sidis pli (longe) ol sidi tutan horon.*
- *Lin ne vigligus la espero doni iam ion pli bonan **ol tio, kio jam ekzistas**.* [FK.289] *= ... ion, kio estas pli bona ol tio, kio jam ekzistas.*
- *Mi havas alian proponon **ol la ĵus prezentita (propono)**. = ... proponon, kiu estas alia ol la ĵus prezentita propono.*
- *Tiuj ĉi ŝuoj povis aparteni al neniu alia **ol Clemency Newcome**.* [BV.79] *= ... al neniu alia ol estas Clemency Newcome.* Ĉi tie oni ankaŭ povas uzi *al* en la kompara esprimo: *... ol (aparteni) al Clemency Newcome*.
- *Antono devis pensi pri io alia **ol pri sia ama aflikto**.* [FA3.144] *= ... pensi pri io alia, ol pensi pri sia ama aflikto*. Aŭ *ol lia ama aflikto = ... pensi pri io, kio estas alia, ol lia ama aflikto.* Rimarku, ke estas *sia* en la unua varianto, sed *lia* en la dua.
- *Antono devis pripensi ion alian **ol sian aman aflikton / ol lia ama aflikto**. = ... pripensi ion alian, ol pripensi sian aman aflikton. / = ... pripensi ion, kio estas alia, ol lia ama aflikto.*

## *Pli ol* kaj *malpli ol* kiel nuancilo

Iafoje *pli ol* aŭ *malpli ol* rolas kiel nuancilo de vorto aŭ esprimo en maniero, kiun oni apenaŭ povas klarigi per subfrazo. La tuto estas kiel unu bloko. Oni uzas aŭ ne uzas rolmontrilojn, kvazaŭ *(mal)pli ol* tute ne ĉeestus:

- *Al liaj malpaciencaj demandoj ŝi respondis per tono mallonga, **pli ol indiferenta**, per tono malkontenta.* [M.163]
- *Vi estas **pli ol beleta**, vi estas bela!* [FA2.98]
- *Ni havas plenan nombron da laboristinoj, eĉ **pli ol plenan** nombron.* [M.183]
- *Al Kristino estas bone, eĉ **pli ol bone**.* [FA3.91]
- *Gaje li kantadis malnovajn melodiojn kaj pafadis kaj bataladis, kvazaŭ li estus **pli ol homo**.* [FA2.111]

Ofte temas pri nuancado de nombro aŭ kvanto. Legu pri tio en la klarigoj pri nuanciloj de nombraj kaj kvantaj vortoj en §23.6.

### Mem-komparoj

Iafoje oni komparas du priskribojn de unu sama afero. Se la du priskriboj estas A-vortaj, kaj se ambaŭ estas rektaj priskriboj de la sama O-vorto, kaj se tiu O-vorto havas N-finaĵon, tiam ambaŭ A-vortoj havu N-finaĵon:

- *Karlo havas domon same altan **kiel larĝan**.* La alteco de la domo egalas al la larĝeco de la domo.
- *Karlo havas domon pli altan **ol larĝan**.* La alteco de la domo superas la larĝecon de la domo.

### Komparo kun verbo

Iafoje kompara *kiel*-esprimo rilatas al verbo (kaj aliaj frazpartoj, kiuj apartenas al tiu verbo):

- *Elizabeto kolektas poŝtmarkojn **kiel hobio**.* = *Elizabeto kolektas poŝtmarkojn hobie.* La kolektado de poŝtmarkoj estas hobio por ŝi. Rimarku, ke la *kiel*-esprimo ne rilatas al la vorto *poŝtmarkojn*, sed al la verbo *kolektas* (aŭ pli ĝuste al la tuta verba esprimo *kolektas poŝtmarkojn*). Tial oni ne diru ... *kiel hobion*, ĉar tio signifus, ke la poŝtmarkoj estas hobio, aŭ ke Elizabeto kolektas poŝtmarkojn tiel, kiel oni kolektas hobion.
- ***Kiel provo eltrovi la veron**, mi aranĝis por li ruzan kaptilon.* Ne la kaptilo estis provo, sed la aranĝado de la kaptilo.

### 20.1.3. *Kiel* por rolo, funkcio k.s.

Kompara *kiel*-esprimo kun O-vorta frazparto (*kiel filo*, *kiel bona homo*, *kiel sekretarion*, *kiel premion* k.s.), kiu kunlaboras kun **subkomprenata** *tiel*, tre ofte havas specialan sencon. Tia *kiel*-esprimo devus montri manieron, sed tre ofte ĝi anstataŭe esprimas, kio, kiu aŭ kia estas iu aŭ io. Ĝi montras rolon, funkcion aŭ similan sencon. Iafoje tio miksiĝas kun maniera senco:

- *Mi elektis lin **kiel prezidanto**.* [LR.78] Klariga formo: *Mi elektis lin tiel, **kiel <u>prezidanto</u> elektas**.* La klariga subfrazo esprimas la manieron de elektado. Sed la efektiva senco de la mallonga formo tre ofte estas: *Mi elektis lin, ĉar mi estas prezidanto. Mi estante prezidanto elektis lin. Mi elektis lin en mia rolo de prezidanto.*
- *Mi elektis lin **kiel prezidanton**.* [LR.78] Klariga formo: *Mi elektis lin tiel, **kiel oni elektas <u>prezidanton</u>**.* La senco de la klariga subfrazo estas maniera, sed la mallonga formo pli ofte vere celas esprimi la jenon: *Mi elektis lin, por ke li estu prezidanto. Mi elektis, ke li estu prezidanto.* (Tiun ideon oni alternative povas esprimi sen *kiel*: *Mi elektis lin prezidanto.* Tiam la frazparto *prezidanto* estas perverba priskribo de la objekto *lin* §25.1.2, kaj tiam la vorto *prezidanto* ne havu N-finaĵon.)

Ĉe tiaj rolaj aŭ funkciaj *kiel*-esprimoj oni decidas, ĉu uzi N-finaĵon aŭ ne (*kiel prezidanto* aŭ *kiel prezidanton*) laŭ la formo en klariga subfrazo, kiu esprimas manieron, kvankam la efektiva senco estas klarigenda per subfrazo, en kiu la responda vorto povas havi alian formon.

- *Vi povus ricevi lin* ***kiel edzon****.* FA1.46 *= ... por ke li estu via edzo.* (*... tiel, kiel oni ricevas edzon.*)
- *Mi komprenas, ke* ***kiel pastro*** *vi ne povas tion ĉi fari.* OV.336 *= Mi komprenas, ke, ĉar vi estas pastro, vi ne povas tion ĉi fari.*
- ***Kiel urbestro*** *de la ĉi-tiea urbo mi havas la devon zorgi pri tio, ke al la traveturantoj* [...] *estu nenia premado.* Rz.29 *= En mia rolo de urbestro ...*
- *Marta rigardis la parolantan virinon* ***kiel orakolon****.* M.36 *= Marta opiniis, ke la parolanta virino estas (simila al) orakolo.* (*... tiel, kiel oni rigardas orakolon.*)
- ***Kiel lingvo internacia*** *estos eble elektita ia el la lingvoj naciaj.* FK.260 *= Por la rolo de lingvo internacia ...*
- *Oni ricevis* ***kiel aldonon*** *ses grandajn bulkojn.* FA1.79 *= Oni ricevis ses grandajn bulkojn, kiuj estis aldono (al tio, kion oni aĉetis).*
- *La longaj diverskoloraj tapiŝoj* [...] *estis nun pendigitaj* ***kiel murornamaĵoj****.* FA4.24 *= ... por ke ili estu murornamaĵoj.*
- *Mi aperis al Abraham, al Isaak, kaj al Jakob* ***kiel Dio la Plejpotenca****.* Er.6 *= ... estante Dio la Plejpotenca.*
- *Karlo gratulis Petron* ***kiel unua*** *okaze de lia naskiĝtago. = Karlo gratulis Petron, estante la unua (persono), kiu faris tion ...*

Rimarku, ke la vorteto *tiel*, kun kiu tia *kiel*-esprimo teorie kunlaboras, neniam aperas, kiam la senco estas rola aŭ funkcia. Se oni aldonas *tiel*, la senco nepre estas maniera: *Mi elektis lin tiel,* ***kiel prezidanton****. = Mi elektis lin tiamaniere, kiel oni elektas prezidanton.*

Se *kiel*-esprimo estas laŭsence klare rola aŭ funkcia (ne maniera), oni ordinare ne uzas rolvorteton post *kiel*, eĉ se klariga subfrazo kun maniera senco postulas, ke estu rolvorteto:

- *La membroj diskutis pri Karlo* ***kiel prezidanto****.* La efektiva senco estas: *... pri Karlo en la rolo de (eventuala estonta) prezidanto.* Se oni dirus *... kiel pri prezidanto*, temus pri la maniero de diskutado.
- *Elizabeto venkis ilin per siaj vortoj* ***kiel armilo****.* Ne *... kiel per armilo*.
- *Ni parolis pri la rolo de Esperanto* ***kiel ilo por la paco****.* Ne *... kiel de ilo por la paco*.

Ĉe Zamenhof oni tamen povas trovi kelketajn ekzemplojn de rolvorteto en tiaj esprimoj. Ili hodiaŭ sonas iom strange:

- *Marion* [...] *al li* ***kiel al frato*** *promesis, ke* [...] *ŝi al Grace ĉion rakontos per propra buŝo.* BV.87 *= ... al li, ĉar li estas ŝia frato, promesis ...* Prefere oni diru *kiel frato*.

Nur la kunteksto povas montri definitive, ĉu *kiel*-esprimo montras manieron, rolon aŭ funkcion. Por fari distingon inter la maniera kaj rola sencoj, oni eksperimentis per la nova vorteto **estiel** (ia mikso de *estante* kaj *kiel*), kiu montras nur rolon, funkcion k.s. Sed **estiel** ne populariĝis. Se oni ekuzus ĝin sisteme, ĝi fariĝus tre ofta, ĉar multaj *kiel*-esprimoj havas tian sencon. Aliaj proponoj estas *este* kaj *estkiel* (komparu kun *samkiel*, §20.1.5).

En la praktiko la kunteksto preskaŭ ĉiam komprenigas la sencon, kaj tial oni ordinare povas simple uzi *kiel*. Sed se iam povas esti dubo, oni povas uzi diversajn pli klarajn esprimojn. Jen kelkaj ekzemploj:

- ***Estante urbestro** mi havas la devon zorgi pri ĉio.*
- *Ŝi estus bona por mi, **se ŝi estus mia edzino**.*
- *Mi komprenas, ke vi, **kiu estas pastro**, ne povas tion ĉi fari.*
- *Elizabeto estis dungita **por esti estro de la nova sekcio**.*

### 20.1.4. Komparaj esprimoj — ĉu mallongigitaj frazoj?

Multaj komparaj *kiel*-esprimoj povas esti rigardataj kiel mallongigitaj subfrazoj, sed ofte estas grava diferenco inter la mallonga kompara esprimo kaj la subfrazo, al kiu ĝi teorie respondas. Vidu ekzemple la ĉi-antaŭajn klarigojn pri *kiel* por rolo kaj funkcio (§20.1.3).

Ofte la klariga subfrazo eĉ ne komenciĝas per *kiel*, sed per alia KI-vorto:

- *La hundo de Elizabeto estas por ŝi **kiel familiano**. = ... estas por ŝi tia, **kia estas (por ŝi) familiano**.* La subfrazo ne komenciĝas per *kiel*, sed per *kia*.
- *Petro laboras en la sama firmao **kiel Anno**. = ... en la sama firmao, **en kiu laboras Anno**.* La subfrazo komenciĝas per *kiu* anstataŭ *kiel*.

Komparaj *kiel*-esprimoj do ne ĉiam estas mallongigitaj subfrazoj.

Iuj pensas, ke oni ĉiam en egaleca komparo uzu tiun KI-vorton, kiun oni uzas en la plena klariga subfrazo. Ili tiam ofte uzas *kia* kaj iafoje *kiu* aŭ *kiom* anstataŭ kompara *kiel*. Tia uzo estas netradicia kaj ĝenerale evitinda. Iafoje ĝi povas fariĝi tre maleleganta:

- *Li vizitis tiajn urbojn, **kiaj estas Parizo kaj Londono**. → *Li vizitis (tiajn) urbojn **<u>kiaj</u> Parizo kaj Londono**.** Prefere diru: *Li vizitis (tiajn) urbojn **<u>kiel</u> Parizo kaj Londono**.*
- *Li loĝas en la sama urbo, **en kiu mi loĝas**. → *Li loĝas en la sama urbo **en <u>kiu</u> mi**.** Prefere diru: *Li loĝas en la sama urbo **<u>kiel</u> mi**.*
- *Li naskiĝis en la sama tago kaj en la sama loko, **en kiuj mi naskiĝis**. → *Li naskiĝis en la sama tago kaj en la sama loko **<u>en kiuj</u> mi**.** (Aŭ eble: **... kiam kaj kie mi.**) Prefere diru: *Li naskiĝis en la sama tago kaj (en la sama) loko **<u>kiel</u> mi**.*
- *Emilio havis sur si eĉ la saman veston, **kiun ŝi tiam havis sur si**. → *Emilio havis sur si eĉ la saman veston **<u>kiun</u> tiam**.** Diru kiel Zamenhof: *Emilio havis sur si eĉ la saman veston **<u>kiel</u> tiam**.* [M.106]

Se oni uzas plenan subfrazon kun ĉefverbo por esprimi egalecan komparon, oni povas ĝin enkonduki per *kia*, *kiu*, *kiom*, *kiam* k.t.p. (§33.4.2) laŭ la senco. Sed se en kompara esprimo estas sola frazparto (aŭ kelkaj frazpartoj sen ĉefverbo), oni prefere uzu la ĝeneralan komparan vorteton *kiel*. Ĝi estas utila kaj uzinda lingva rimedo.

Sed iafoje oni tamen devas uzi *kiom* anstataŭ kompara *kiel*, se la komparo koncernas kvanton, kaj se oni devas uzi *da*-esprimon post la kompara vort-

eto: *Kaj la Filiŝtoj kolektiĝis, por militi kontraŭ Izrael, tridek mil ĉaroj kaj ses mil rajdantoj, kaj tiom da popolo,* ***kiom da sablo*** **[estas]** ***sur la bordo de la maro****.* [Sm1.13]

En proverboj kun tre mallonga senverba formo, oni ofte uzas *kia* antaŭ sola frazparto en maniero, kiu tre similas al kompara *kiel*: ***Kia patrino****, tia filino.* [PE.689] = ***Kia estas patrino****, tia estas (ankaŭ) la filino.*

### 20.1.5. *Tiel same kiel, same kiel, samkiel*

Oni ofte uzas *same* kune kun kompara *kiel* por akcenti, ke la simileco estas tre granda, ĝis efektiva sameco. Zamenhof uzis preskaŭ ĉiam la longan esprimon *tiel same kiel*. Nuntempe oni ordinare uzas la pli mallongan formon *same kiel*, kiun oni iafoje eĉ simpligas al *samkiel*:

- *Vi tion ja ekkonas, patrino, per la sento,* ***tiel same kiel mi****.* [FA4.22]
- *La kompatinda Elinjo-fingreto stariĝis antaŭ la pordo, tute* ***tiel same kiel ĉiu alia almozulino****, kaj petis pri malgranda peco da hordea greno.* [FA1.45] Ĉi tie *tute* eĉ pli emfazas la samecon de la komparo.
- *Tolstoj* ***same kiel Zamenhof*** *komprenis la malbonojn de la nuntempa soci-ordo.*
- *Ni volas kulturi en ni la homecon kaj fordetrui la naciecon –* ***samkiel la kamparano kulturas la tritikon kaj elŝiras lolon****.*
- *Hodiaŭ,* ***samkiel hieraŭ****, ili rifuzas kunlabori.*

La plej simplan formon *samkiel* oni ne trouzu. Ĝi taŭgas, kiam *sam-* estas nura nuancilo de *kiel*. Se temas pri memstara ideo de sameco, oni uzu la plenan vorton *same*:

- *Li kantas* ***(tiel) same kiel mi****.* = *Li kantas* ***samkiel mi****.* Ĉi tie la senco estas, ke li kantas, kaj ke ankaŭ mi kantas. Ni faras la saman agon (sed eble en malsamaj manieroj). Oni kutime elparolas kun paŭzeto antaŭ *(tiel) same*, kaj kredeble estas preferinde skribi kun komo: *Li kantas,* ***(tiel) same kiel mi****.* En tiu ĉi okazo *samkiel* estas uzebla alternativo.
- *Li kantas* ***same kiel mi****.* Ĉi tie la senco estas, ke li kantas en la sama maniero, en kiu mi kantas. Oni kutime elparolas sen paŭzeto antaŭ *same*, kaj oni do ne aldonu komon. En tiu ĉi okazo oni ne uzu *samkiel*. Sed oni tute bone povas uzi *tiel* anstataŭ *same*: *Li kantas tiel, kiel mi.* Oni ankaŭ povas meti *same* antaŭ la verbon: *Li same kantas kiel mi.*

Por ambaŭ ĉi-antaŭe montritaj sencoj de *Li kantas same kiel mi*, oni ankaŭ povas uzi la plej simplan (sed malpli akcentan) formon *Li kantas kiel mi*. Se oni tiam celas la unuan sencon, estas tamen preferinde uzi komon (kaj paŭzeton): *Li kantas, kiel mi.*

## 20.2. Aliaj montriloj de komparo

### *Kvazaŭ*

En egalecaj komparoj oni povas uzi *kvazaŭ* anstataŭ kompara *kiel* (§20.1), se temas pri simileco, kiu estas nur ŝajna aŭ nereala, kaj se oni volas tion emfazi:

- *Dum momento li staris senmova, **kvazaŭ ŝtoniĝinta**.* [M.164] Li ne vere estis ŝtoniĝinta.
- *Silente li migris tra la lando, kiu aperis al li **kvazaŭ abunda frukto-ĝardeno**.* [FA3.64]
- *Ĉiu statuo sur la riĉaj sarkofagoj ŝajnis **kvazaŭ ricevinta vivon**.* [FA1.215]

Iafoje oni devas uzi N-finaĵon (aŭ alian rolmontrilon) post kompara *kvazaŭ* same kiel ĉe kompara *kiel* (§20.1.2):

- *Tiesto ŝtelis filon de Atreo kaj lin edukis **kvazaŭ sian propran**.* [IT.21]

Antaŭ O-vorta frazparto (sen rolmontrilo) la diferenco inter kompara *kiel* kaj kompara *kvazaŭ* povas esti tre granda:

- *Karlo naĝas **kiel delfeno**.* = *Karlo naĝas tiel, kiel delfeno naĝas*. Lia naĝomaniero similas al la naĝomaniero de delfeno.
- *Karlo naĝas **kvazaŭ delfeno**.* = *Karlo naĝas tiel, ke li ŝajnas esti delfeno*. Karlo mem similas al delfeno.
- *Petro voĉdonis **kiel prezidanto**.* = *... tiel, kiel voĉdonas prezid-anto / ... en sia rolo de prezidanto (li efektive estis prezidanto)*.
- *Petro voĉdonis **kvazaŭ prezidanto**.* = *Petro ŝajnis esti prezidanto, kiam li voĉdonis (sed li ja ne estis prezidanto).*

*Kvazaŭ* havas ankaŭ aliajn uzojn: §14.3.12.

### Komparaj rolvortetoj

- *Al* (§12.3.5.1) povas montri tion, al kio oni referencas en esprimo de simileco aŭ malsimileco: *Ĝi estis tre (mal)simila **al la alia**.*
- *De* (§12.3.2.5) povas montri malsimilecon: *Mi estas diferenca **de vi**.*
- *Kontraŭ* (§12.3.4.8) povas signifi "kompare kun": *La Eternulo, la Dio de viaj patroj, multigu vin miloble **kontraŭ via nuna nombro**.* [Re.1]
- *Antaŭ* (§12.3.4.1) kaj (malofte) *post* (§12.3.4.9) povas montri pozicion (mal)pli altan en graveco aŭ rango: ***Antaŭ ĉio** zorgu oficon, – plezuro atendos sian vicon.* [PE.859]
- *Ĉe* (§12.3.4.3) kaj *apud* (§12.3.4.2) povas en figuraj esprimoj montri komparon: *Se lin kompari kun la nuna reĝo, li estis Apolono **ĉe Satiro**.* [H.13]
- *Super* (§12.3.4.12) kaj *sub* (§12.3.4.11) povas montri pli kaj malpli altan pozicion en rango, forteco, valoro k.t.p.: *Kial ili suferis, kial vi triumfis **super ili**?* [Rt.127]

- *Krom* (§12.3.6.3) povas esti uzata anstataŭ *ol* post *nenio alia*, *nenio pli*, *neniu alia*, *neniu pli* k.s.

## Komparaj vortetoj ĉe *preferi*

Ĉe *preferi* (*prefere*, *prefero* k.s.) oni povas montri la malpreferaĵon per ia vorteto. Antaŭ I-verbo oni uzas *ol*, iafoje *anstataŭ*. Antaŭ O-vorto aŭ O-vorteca vorteto oni normale uzas *al*, sed ankaŭ *antaŭ*, *kontraŭ* kaj *anstataŭ* estas eblaj:

- *Mi preferas esti mortigita de ili,* ***ol esti pinĉata de la anasoj*** [...]*!* [FA2.41]
- *Tiam Dio inspiris al mi la ideon ekbruligi mian liton, prefere neniigi mian domon per fajro,* ***ol permesi, ke la granda amaso da homoj mizere pereu****.* [FA3.152]
- *Mia edzino preparas manĝojn, kiujn mi certe preferas* ***al la manĝoj el la kuirejoj de la plej bonaj hoteloj****.* [FK.108]
- *Li ne atentas la vizaĝon de princoj, kaj ne preferas riĉulon* ***antaŭ mal-riĉulo****.* [Ij.34]
- *Preferos la morton* ***ol la vivon*** *ĉiuj restintoj.* [Jr.8] = *... ol elekti la vivon ...* *Ol* rilatas al subkomprenata I-verbo. Tial oni uzas *ol*.
- *La aliaj anasoj preferis naĝadi en la kanaloj,* ***anstataŭ viziti ŝin****.* [FA2.34]

# 21. Neado

## Ne

Por nei frazon oni uzas la vorteton *ne*. *Ne* neas tion, antaŭ kio ĝi staras. Normale *ne* staras antaŭ la ĉefverbo, kaj se oni neas la ĉefverbon, oni neas la tutan frazon:

- *Mi **ne** dormas.* Ne estas tiel, ke mi dormas. Mia dormado entute estas neata.
- *Mi **ne** amas vin.* Ne estas tiel, ke mi amas vin. La tuta frazo estas neata.
- *Al leono **ne** donu la manon.* [FE.7]
- *Mi **ne** amas obstinajn homojn.* [FE.10]
- ***Ne** skribu al mi tiajn longajn leterojn.* [FE.18]
- *La patro **ne** legas libron, sed li skribas leteron.* [FE.9] La neo trafas la verbon *legas*. La verbo *skribas* kaj ĝia tuta frazo restas validaj.

Neado en subfrazo validas nur ene de la subfrazo: *Mi diris, ke mi **ne** venos.* La neado trafas nur la subfrazan ĉefverbon *venos*. La tuta frazo restas pozitiva: Mi ja diris tion.

Iafoje okazas, ke neata ĉefverbo estas subkomprenata: *Ĉiu povu vidi, kiu el la vastigantoj plenumas sian promeson kaj kiu **ne**.* [OV.111] La neado trafas la subkomprenatan verbon *plenumas*: *... kaj kiu **ne** plenumas sian promeson.*

*Ne* estas ankaŭ respondvorto: §22.4.

## Tabelvortoj je NENI

Por nei oni povas ankaŭ uzi tabelvortojn je NENI (§13.1). NENI-vorto sufiĉas por nei la ĉefverbon, kaj do la tutan frazon. La pozicio de NENI-vorto normale ne gravas, ĝi tamen neas la tutan frazon:

- *La tempo pasinta jam **neniam** revenos; la tempon venontan **neniu** ankoraŭ konas.* [FE.22] La pasinta tempo ne revenos. Oni ne konas la tempon venontan.
- *Mi **neniel** povas kompreni, kion vi parolas.* [FE.28] Mi ne povas kompreni.
- *La nokto estis tiel malluma, ke ni **nenion** povis vidi eĉ antaŭ nia nazo.* [FE.33] Ni ne povis vidi. La neado koncernas nur la *ke*-frazon. La ĉeffraza verbo *estis* restas pozitiva.
- *Mi **neniam** prenas kun mi multon da pakaĵo.* [FE.35] Mi ne prenas multon da pakaĵo.
- *Mia onklo **ne** mortis per natura morto, sed li tamen **ne** mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de **neniu**.* [FE.39] La du unuaj ĉefverboj (*mortis*, *mortigis*) estas plene neataj per *ne*. La tria, *estis mortigita*, estas plene neata per *neniu*.
- ***Neniu** radio al mi lumas, **neniu** varma aereto blovas sur min, **neniu** amiko min vizitas.* [Rt.117] Ne lumas radio. Ne blovas aereto. Ne vizitas amiko.

- *Memoru, ke Esperanto estas* ***nenies*** *proprajô.* [OV.388] Esperanto ne estas ies proprajô.
- *Mi* ***nenial*** *povus mortigi alian homon.* Mi ne povus mortigi alian homon pro ĉia ajn kialo. *Nenial* neas la tutan frazon. Aperis tamen duboj pri la nea valoro de *nenial*: §14.3.1.

### *Apenaŭ*

Ankaŭ la vorteto *apenaŭ* (§14.3.7) (= "preskaŭ ne") kalkuliĝas kiel nea vorto:

- *La okuloj* ***apenaŭ*** *retenis larmojn.* [M.8] = *La okuloj preskaŭ ne retenis larmojn.*
- *Oni* ***apenaŭ*** *povis ion vidi antaŭ si.* [FA4.173] = *Oni preskaŭ ne povis ...*

### Duobla neado

Se oni uzas NENI-vorton, kaj aldonas ankaŭ la vorton *ne*, la frazo fariĝas pozitiva. Tia duobla neado estas uzebla nur por esprimi tre specialajn signifojn:

- *Mi* ***ne*** *amas* ***neniun***. Ne estas tiel, ke mi amas neniun. Mi do ja amas iun.
- *Ĝi* ***ne*** *estas* ***nenies*** *proprajô.* Ne estas tiel, ke ĝi estas nenies proprajô. Ĝi do estas ies proprajô.
- *Li tion faradis tiel lerte, ke oni* ***ne*** *povis* ***ne*** *ridi.* [FA2.53] Ne estas tiel, ke oni povis ne ridi. Sekve oni devis ridi.

Frazo ankaŭ povas fariĝi pozitiva, se unu NENI-vorto klare neas la verbon, kaj ankaŭ alia NENI-vorto aperas en la frazo:

- *Mi ankoraŭ* ***neniam*** *gajnis* ***nenion***. = *Neniam okazis tio, ke mi gajnis nenion.* Mi ĉiufoje gajnis almenaŭ ion.

Sed pluraj NENI-vortoj en la sama frazo ne nepre kreas pozitivan signifon. Ofte ili nur plifortigas unu la alian, kaj la neado restas:

- *Ni malutilon alportus al nia afero grandan, kaj utilon ni alportus al* ***neniu nenian***. [LR.51A] Ni ne alportus utilon.
- ***Neniam, neniam, neniam*** *li revenos.* [Rt.35] Li ne revenos. Ne gravas, ĉu estas unu, du, tri aŭ eĉ pli da *neniam*.

### Parta neado

Iafoje la vorteto *ne* aperas en frazo tiel, ke ĝi neas nur parton de ĝi. La ĉefverbo restas valida. *Ne* neas ĝuste tion, antaŭ kio ĝi staras, sed tio povas esti la tuj sekvanta vorto, la sekvanta frazparto, aŭ eĉ pli multe. Nur la kunteksto povas montri precize, kio estas neata:

- *Ni faris la kontrakton* ***ne*** *skribe, sed parole.* [FE.31] Ni ja faris la kontrakton, sed ne skribe.
- *Li venis al mi tute* ***ne*** *atendite.* [FE.22] Li ja venis, sed oni ne atendis tion.
- ***Ne*** *ĉiu kreskajô estas manĝebla.* [FE.41] Iuj kreskajôj ja estas manĝeblaj. Komparu kun: *Ĉiu kreskajô* ***ne*** *estas manĝebla.* = *Neniu kreskajô estas manĝebla.*

- *Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili* ***ne*** *<u>ĉiam</u> estas faritaj el tolo.* FE.36 Ofte ili ja estas el tolo.
- *Li estas homo* ***ne*** *<u>kredinda</u>.* FE.41 Li ja estas homo.
- *Respondo venis* ***ne*** *<u>tuj</u>.* M.50 Respondo ja venis, sed post iom da tempo.
- *Mi rezervas al mi la rajton akcepti Vian decidon aŭ* ***ne****, depende de la aŭtoritateco de Via komitato.* L2.6 La neado trafas subkomprenatajn vortojn: *... ne <u>akcepti vian decidon</u>*. La resto de la frazo estas pozitiva.
- *Lernolibron oni devas* ***ne*** *<u>tralegi</u>, sed tralerni.* FE.31 La devo restas valida, sed ĝi estas devo pri io, kion oni ne faru. Legu pli pri *ne* rilate al *devi*, *povi* kaj *voli* en §31.7.4.
- *En la animo ĉiuj privataj homoj kaj ĉiuj registaroj ne povas* ***ne*** *<u>aprobi</u> nian ideon.* OV.206 La unua *ne* trafas la ĉefverbon *povas* kaj neas la tutan frazon. La dua *ne* trafas nur *aprobi (nian ideon)*. La suma signifo estas: *Ili ne povas rifuzi nian ideon. = Ili devas aprobi nian ideon.*
- *Ne miksu vin en aferon* ***ne*** *<u>vian</u>!* Rz.89 *= ... en aferon, kiu ne estas via.* La dua *ne* nur neas la vorton *vian*. La unua *ne* neas la ĉefverbon.
- *En la salono estis* ***neniu*** *krom li kaj lia fianĉino.* FE.26 Ne estis personoj tie kun la escepto de li kaj lia fianĉino, kiuj ja estis tie. *Krom* (§12.3.6.3) apartigas parton de la frazo, por kiu la neado ne validas.

NENI-vortoj normale neas la tutan frazon sendepende de la vortordo, sed iafoje ankaŭ NENI-vorto povas validi por nur parto de frazo. Tiam la kunteksto kaj la vortordo devas tute klare tion montri:

- *Mi decidis <u>paroli jam plu</u>* ***<u>nenion</u>*** *<u>pli pri tiu ĉi temo</u>.* L1.68 La decido estas reala. La neado trafas nur la I-verbon *paroli* kaj ĉiujn frazpartojn, kiuj rilatas rekte al ĝi.
- *Pli valoras faro* ***nenia****, ol faro malbona.* PE.841 *= Faro, kiu ne okazis, ja valoras pli, almenaŭ kompare kun faro malbona.* La ĉefverbo *valoras* restas pozitiva.

Kiam *ne* aŭ NENI-vorto estas parto de kunmetita vorto, la neado validas nur ene de tiu vorto:

- *Sinjoro, vi estas* ***neĝentila****.* FE.16 La frazo diras, ke la sinjoro ja havas certan econ, nome mankon de ĝentileco. Estas nur subtila diferenco disde: *Vi ne estas ĝentila.*
- *La pastro, kiu mortis antaŭ* ***nelonge*** *(aŭ antaŭ* ***nelonga*** *tempo), loĝis longe en nia urbo.* FE.25 La neado koncernas nur la longecon de la tempo.
- *Bedaŭrinde ili estas* ***ne-esperantistoj****.* Ili estas tiaj homoj, kiuj ne scias Esperanton.
- ***Neniofarado*** *estas tre dolĉa okupo.* Tia tempo, en kiu oni faras nenion, estas tre dolĉa.

Ankaŭ *apenaŭ* povas uziĝi por parta neado:

- ***Apenaŭ*** *rimarkebla ektremo trakuris ŝin de la kapo ĝis la piedoj.* M.159 La nea valoro de *apenaŭ* rilatas nur al la vorto *rimarkebla*. La ektremo ja trakuris ŝin.
- *Tiu laboristino havis la aĝon de* ***apenaŭ*** *dudek-ses jaroj.* M.118

### Nek

*Nek* signifas "kaj ankaŭ ne", "kaj ankaŭ nenio" k.s. Oni uzas *nek*, se oni jam uzis *ne* aŭ tabelvorton je NENI, kaj volas nei ankoraŭ ion. Ĝi estas kvazaŭ varianto de *kaj* (§16.1), kaj sekvas baze la samajn regulojn kiel *kaj*:

- *Plue atendi mi ne volas* ***nek*** *bezonas.* M.29 = *... kaj ankaŭ ne bezonas.*
- *Mi ne renkontis lin,* ***nek*** *lian fraton.* FE.28 = *... kaj ankaŭ ne lian fraton.*
- *De hodiaŭ matene mi nenion manĝis* ***nek*** *trinkis!* FA3.75 = *... kaj ankaŭ nenion trinkis!*
- *Nenia peno* ***nek*** *provo donos lakton de bovo.* PE.247 = *... kaj ankaŭ nenia provo ...*

Iafoje, precipe en konversacioj, *nek* signifas simple "ankaŭ ne" (sen "kaj"): *Mi ne ŝatas kafon, diris Karlo.* ***Nek*** *mi, diris Petro.* = *... Ankaŭ mi ne (ŝatas kafon), diris Petro.*

*Nek* ankaŭ povas uziĝi kune kun *apenaŭ*, kvankam tio praktike malofte aperas: *Li apenaŭ spiris,* ***nek*** *moviĝis.* = *Li apenaŭ spiris, kaj ankaŭ apenaŭ moviĝis.* = *Li preskaŭ ne spiris, kaj ankaŭ preskaŭ ne moviĝis.*

Rimarku, ke *nek* ne povas signifi "kaj ankaŭ sen". Ne estas do ebla ekz. **Ni laboradis sen halto* ***nek*** *ripozo.** Oni devas uzi *... sen halto kaj ripozo*, *... sen halto kaj sen ripozo* aŭ *... sen halto kaj ankaŭ sen ripozo*.

*Nek* ne egalas al *ne* + emfazo. Por emfaze nei, oni uzu *eĉ* kune kun *ne*. Ne diru: **Mi havas* ***nek*** *unu amikon.** Diru: *Mi havas* ***eĉ ne*** *unu amikon.* Aŭ: *Mi* ***ne*** *havas* ***eĉ*** *unu amikon.* Ne diru: *****Nek*** *unu spesdekon havis liaj gepatroj.** Diru: ***Eĉ*** *unu spesdekon* ***ne*** *havis liaj gepatroj.* FA4.122 *Neniu povas ŝin kompreni,* ***eĉ ne*** *ŝia edzo.* Tie ne temas pri aldono de plia neo. Ne havus sencon diri *... kaj ankaŭ ne ŝia edzo*, ĉar la edzo jam estas neita per *neniu*. *Nek* signifas nur "kaj ankaŭ ne".

Oni ankaŭ povas uzi kombinitan, pluroblan *nek* (§17.6).

# 22. Demandoj kaj respondoj

Demando estas unu el kvar ĝeneralaj fraztipoj (§32.1). Ekzistas du specoj de demandoj: KI-demandoj (§22.1) kaj *ĉu*-demandoj (§22.2).

## 22.1. KI-demandoj

KI-demandoj estas farataj per tabelvortoj je KI (§13.1). Demanda KI-vorto reprezentas informon, kiun oni serĉas. KI-vorto normale staras komence de la demanda frazo:

- ***Kie** estas la libro kaj la krajono? – La libro estas <u>sur la tablo</u>, kaj la krajono kuŝas <u>sur la fenestro</u>.* [FE.6]
- ***Kiun** daton ni havas hodiaŭ? – Hodiaŭ estas <u>la dudek sepa (tago) de Marto</u>.* [FE.12]
- *"**Kion** vi volas?" demandis la forĝisto. "<u>Orajn hufumojn</u>!" respondis la skarabo.* [FA4.219]
- ***Kian** signifon havas la morto? La korpo dissolviĝas, kaj la animo... **kio** ĝi estas? **Kio** ĝi fariĝas? **Kien** ĝi iras? "<u>Al eterna vivo</u>," diras la konsolo de la religio. Sed **kia** estas la transiro? **Kie** oni vivas kaj **kiel**? "<u>En la ĉielo supre</u>!" diras la piuloj; "supren ni iras!"* [FA3.115]
- ***Kiom** da pomoj vi havas? – Mi havas <u>du kilogramojn</u> da pomoj!*
- ***Kies** filo vi estas, junulo? Kaj David respondis: Filo <u>de via sklavo Jiŝaj, la Bet-Leĥemano</u>.* [Sm1.17]
- *Kaj Dio la Eternulo diris al la virino: **Kial** vi tion faris? Kaj la virino diris: <u>La serpento tromplogis min, kaj mi manĝis</u>.* [Gn.3]

Iuj KI-vortoj estas E-vortecaj (§14), dum aliaj estas O-vortecaj kaj A-vortecaj (§15).

Se oni iam metas demandan KI-vorton frazfine anstataŭ frazkomence, oni kreas tre fortan emfazon pro la malkutimeco. Tia demando estas ofte eĥa demando por rekonfirmo de io ĵus aŭdita: *Mi volas, ke vi donu al mi vian novan aŭton! – Vi volas **kion**?!* Demando miksita kun forta surprizo.

Se iafoje oni havas en la sama demanda frazo pli ol unu demandan KI-vorton, nur unu el ili bezonas stari frazkomence: ***Kiu** diris **kion** al **kiu**?*

Legu pli pri la frazpozicio de KI-vortoj en §34.2.1.

Iafoje oni ellasas la demandan KI-vorton el demando (§22.3).

Oni uzas KI-vortojn ankaŭ en demandaj subfrazoj (§33.3): *Ŝi demandis, **kion** mi volas.*

## 22.2. *Ĉu*-demandoj

*Ĉu*-demandoj estas farataj per la demandvorto *ĉu*. *Ĉu*-demando serĉas konfirmon pri la ĝusteco de la tuta frazo. La respondo ordinare estas *jes* aŭ *ne* (§22.4).

*Ĉu* normale staras komence de la demanda frazo:

- ***Ĉu** vi komprenas min? – Jes, mi komprenas vin! Ne, mi ne komprenas vin!*
- ***Ĉu** vi estas kanadano? – Jes, mi estas kanadano! Ne, mi ne estas kanadano!*
- ***Ĉu** li? – Jes, li!*
- ***Ĉu** ĝi estas taŭga? – Jes, (ĝi) estas!*
- ***Ĉu** vi diros al mi la veron?* FE.18
- ***Ĉu** vi jam trovis vian horloĝon?* FE.20
- ***Ĉu** vi amas vian patron? Kia demando! kompreneble, ke mi lin amas.* FE.41

*Ĉu*-demando povas ankaŭ esti alternativdemando. Tiam la respondo normale estas elekto inter la diversaj alternativoj:

- ***Ĉu** vi volas kafon aŭ teon? – Mi volas kafon! Mi volas teon! Mi volas nek kafon, nek teon! Mi volas kaj kafon, kaj teon!*
- ***Ĉu** li aŭ ŝi? – Ŝi! Li! Iu ajn el ili! Neniu el ili! Ambaŭ!*
- ***Ĉu** vi estas surda aŭ muta?* FE.20
- ***Ĉu** hodiaŭ estas varme aŭ malvarme?* FE.25

Iafoje oni metas *ĉu* ĉe la fino de la demando, ordinare post komo:

- *Vi estas usonano, **ĉu**? = Ĉu vi estas usonano? Vi estas usonano. Ĉu mi pravas?*
- *Tio okazos hodiaŭ, **ĉu**?*

Se oni estas relative certa, sed tamen volas konfirmon, oni ofte uzas *ĉu ne?* ĉe la frazofino:

- *De nun vi restos hejme, **ĉu ne**? = Mi supozas, ke de nun vi restos hejme. Ĉu mi ne pravas?*
- *Tokio estas la ĉefurbo de Japanujo, **ĉu ne**?*

Tia frazofina *ĉu ne?* estas nuntempe tre ofta. Zamenhof tamen uzis anstataŭe *ĉu ne vere?* aŭ eĉ *ne vere?* en tiaj okazoj: *Oni konsentu akcepti la plej malgrandan pagon, **ĉu ne vere**?* M.108 *Tiam vi estos interedzigitaj, **ne vere**?* FA1.235

Se la senco estas aserto kun aldonita peto pri konfirmo, oni ofte tute forlasas la vorton *ĉu* (§22.3).

Por respondi *ĉu*-demandojn oni ofte uzas la respondvortojn *jes* kaj *ne* (§22.4).

## 22.3. Demandoj sen demandovorto

Iafoje *ĉu* aŭ KI-vorto estas forlasita el demanda frazo. Tio okazas precipe en dialogoj. Tiam nur la kunteksto montras, ke temas pri demando. Tia forlaso estas akceptebla, kiam la tuta frazo estas draste mallongigita:

- *– **Efektive?** – ŝi demandis per tirata tono. – Efektive, – respondis Aleĉjo.* M.147 *= – Ĉu efektive vi farus tion? – ŝi demandis ...*

- *"Ĉu ili do distingis sin per brilo?" demandis la peceto da vitro. "**Per brilo?**" ekkriis la flikilo, "ne, sole nur per malmodesteco!* [FA2.85] = ... *Ĉu per brilo?...*
- *Eble el la vestoj ion forkomerci? Vendi ekzemple la pantalonon?* [Rz.106] = *Ĉu mi eble el la vestoj ion forkomercu? Ĉu mi vendu ekzemple la pantalonon?*
- *"**Via nomo? Via profesio?**" demandis la gardostaranto tiun, kiu la unua eliris el la kaleŝo.* [FA4.214] = *Kia estas via nomo? Kia estas via profesio?...*
- *"**Sed la korniko?**" demandis la malgranda Gerda. "Ha, la korniko mortis!"* [FA2.75] = *Sed kio okazis al la korniko?...*

Multaj parolantoj uzas specialan manieron elparoli demandajn frazojn. Ili uzas ekz. leviĝantan melodion en la fino de la frazo. Sed en Esperanto ne ekzistas klare fiksitaj reguloj pri la frazmelodio. Tial, se oni uzas demandon sen *ĉu* aŭ demanda KI-vorto, nur la kunteksto povas montri, ke la frazo estas demanda.

Iafoje oni uzas deklarajn frazojn (§32.1) kun **duba nuanco**. La dubon oni esprimas skribe per demandosigno, sed ne vere temas pri demando, kvankam ofte la parolanto ja deziras, ke la aŭskultanto konfirmu aŭ malkonfirmu la diraĵon. En tiaj okazoj oni ne uzas *ĉu*:

- *Ĉion, kio estis sub la nomo de barono Brambeus* [...] *ĉion tion ĉi mi verkis.– Kion mi aŭdas! **Sekve barono Brambeus estas vi?*** [Rz.46] La dua parolanto ne demandas, ĉu la unua estas barono Brambeus, sed nur konstatas, ke tiu ja estas la barono, sed pro miro kaj dubo volas ricevi konfirmon pri tio.
- *Vi ne volas do indulgon kaj favoron?* [Rt.72] = *Vi ne volas do indulgon kaj favoron. Ĉu mi ĝuste komprenis la aferon?*
- *Eble vi volus donadi lecionojn de muziko?* [M.58] Temas pri propono, sed la proponanto estas iomete malcerta pri la taŭgeco de la propono.
- *Vi min jam ne akceptos? – demandis Marta, – nenian esperon mi povas havi?* [M.184]

## 22.4. Respondvortoj

Por respondi *ĉu*-demandon oni povas simple eldiri frazon (plenan aŭ mallongigitan), kiu donas respondon al la demando:

- *Ĉu vi amas min? – **Mi amas vin!***
- *Kaj ĉu vi longe lernis?* [...] *– **Ho, mi lernis ne malpli ol tri jarojn.*** [M.101]

Sed normale oni uzas la respondvortojn *jes* kaj *ne*. Tia respondvorto estas kiel tuta frazo per si mem. Ofte oni tamen post la respondvorto aldonas tutan respondan frazon aŭ parton de tia frazo por plia klareco.

### *Jes*

La respondvorto *jes* donas **pozitivan** respondon:

- *– Ĉu vi volas kafon? – **Jes**!* (= *Mi volas kafon.*)

- *– Ĉu vi ion deziras? –* ***Jes****!* (= *Mi ion deziras.*)
- *"Ĉu tio estas la malgranda Zefiro?" demandis la reĝido. – "****Jes****, li estas Zefiro!" respondis la maljuna virino.* [FA1.182] Post la respondvorto *jes* sekvas tuta responda frazo.
- *Ĉu la Universala Kongreso estos en Eŭropo ĉi-jare? – Mi pensas, ke* ***jes****! = Mi pensas, ke ĝi ja estos en Eŭropo ĉi-jare!* La respondvorto *jes* anstataŭas la tutan respondan subfrazon (krom la enkonduka *ke*).

Oni ankaŭ povas uzi *jes* responde al nedemanda frazo por konsenti pri io:

- *"Vi havas efektive petolemajn knabojn!" diris la reĝido. – "****Jes****, certe!" ŝi respondis, "kaj mi havas la eblon kvietigi ilin."* [FA1.184]

Oni ne uzu *jes* ene de frazo por emfazi la verecon de io. Por tio oni uzu la vorteton *ja* (§14.3.10). Ne diru: **Tiu ĉi vino ne estas dolĉa, dum tiu alia* ***jes*** *estas.** Diru: *Tiu ĉi vino ne estas dolĉa, dum tiu alia* ***ja*** *estas.*

### *Ne*

La respondvorto *ne* donas **negativan** respondon:

- *– Ĉu vi volas kafon? –* ***Ne****!* (= *Mi ne volas kafon.*)
- *– Ĉu vi ion deziras? –* ***Ne****!* (= *Mi nenion deziras.*)
- *Ĉu vi jam okupadis vin per instruado? –* ***Ne****, sinjorino; mi estas vidvino de oficisto, kiu mortis antaŭ kelke da tagoj. Nur nun la unuan fojon mi deziras komenci la profesion de instruistino.* [M.25]
- *Ĉu li estas blondulo aŭ brunulo? –* ***Ne****, pli kaŝtanhara.* [Rz.39] *= Li estas nek blondulo nek brunulo, li estas pli kaŝtanhara.*
- *Ha, ĉu efektive la malgranda Kay mortis? La rozoj estis sub la tero, kaj ili diras, ke* ***ne****!* [FA2.59] *= ... ili diras, ke li ne mortis.*

Oni ankaŭ povas uzi *ne* responde al nedemanda frazo por malkonsenti pri io:

- *Mi havas pli freŝan panon, ol vi. –* ***Ne****, vi eraras, sinjoro: via pano estas malpli freŝa, ol mia.* [FE.10]

Oni atentu pri la diferenco inter *ne* kiel nea vorto ene de frazo (§21), kaj *ne* kiel respondvorto:

- ***Ne*** *venu ĉi tien! = Mi volas, ke vi* ***ne*** *venu ĉi tien. Ne* neas la ĉefverbon.
- ***Ne****, venu ĉi tien! =* ***Ne****! Mi ja volas, ke vi venu ĉi tien. Ne* estas respondvorto, kaj rolas pli-malpli kiel tuta frazo per si mem.

Se tuj post responda *ne* sekvas frazo, kiu komenciĝas per verbo, oni devas elparoli kun klara paŭzo post *ne* por eviti miskomprenon.

### *Jes* kaj *ne* ĉe neaj demandoj

Kiam oni respondas pozitivajn demandojn, la uzo de la respondvortoj *jes* kaj *ne* estas sufiĉe simpla. Sed oni uzas ankaŭ negativajn demandojn, demandojn kun nea vorto. La uzo de *jes* kaj *ne* responde al tiaj demandoj estas bedaŭrinde malpli klara.

Ekzistas du manieroj uzi respondvortojn ĉe negativaj demandoj. Unu sistemo estas pli ofta en okcidentaj lingvoj, la alia sistemo estas pli ofta en

orientaj lingvoj. Tial oni povas paroli pri **okcidenta** kaj **orienta** uzado, sed fakte en multaj landoj kaj lingvoj ambaŭ sistemoj ekzistas paralele. Ankaŭ en Esperanto ambaŭ sistemoj estas hejmaj. Zamenhof pli ofte uzis *jes* kaj *ne* laŭ la okcidenta sistemo, sed li ankaŭ plurfoje uzis la orientan sistemon.

### Okcidenta sistemo

En la **okcidenta** sistemo *jes* reprezentas pozitivan respondfrazon, kaj *ne* reprezentas negativan respondfrazon. Negativa respondfrazo estas frazo, kiu mem esprimas neon (en sia ĉeffraza parto).

En la okcidenta sistemo la signifo de respondvorto estas sendependa de la formo de la demando. Se la demando estas nea, oni respondas per la sama respondvorto, kiun oni uzus, se la demando estus sen nea vorto. Gravas nur la formo de tiu respondfrazo, kiun la respondvorto reprezentas:

- *Ĉu vi volas kafon?* (pozitiva demando)
  - ***Jes**!* (= *Mi volas kafon.*)
  - ***Ne**!* (= *Mi ne volas kafon.*)
- *Ĉu vi ne volas kafon?* (negativa demando)
  - ***Jes**!* (= *Mi volas kafon.*)
  - ***Ne**!* (= *Mi ne volas kafon.*)
- *Ĉu ne kafon vi volas?* (parte negativa demando)
  - ***Jes**!* (= *Efektive kafon mi volas.*)
  - ***Ne**!* (= *Ne kafon mi volas.*)
- *Ĉu vi volas ne kafon, sed teon?* (parte negativa demando)
  - ***Jes**!* (= *Efektive teon mi volas.*)
  - ***Ne**!* (= *Teon mi ne volas.*)
- *Ĉu vi nenion deziras?*
  - ***Jes**!* (= *Mi ja deziras ion.*)
  - ***Ne**!* (= *Mi deziras nenion.*)
- *Tion vi volas, ĉu ne?*
  - ***Jes**, fakte mi volas tion.*
  - ***Ne**, fakte mi ne volas tion.*
- *Ĉu vi ne scias, ke li ne alvenis?*
  - ***Jes**, mi ja scias, ke li ne alvenis.*
  - ***Ne**, mi ne scias, ke li ne alvenis.*
- *"Ĉu ili ne mortas* [...]*?" – "Ho **jes**",* [...] *"ili ankaŭ devas morti".* [FA1.92]
- *"Sed ĉu mi ankaŭ ne povus vidi la florojn?" – "Ho **jes**!"* [...] *"nur ne forgesu, kiam vi denove estos tie, rigardi tra la fenestro, tiam vi certe ilin vidos."* [FA1.31] *Jes = Vi ja povus ilin vidi!*
- *Ĉu vi ne faros ian rimarkigon pri la aferoj de la poŝta administrado? – **Ne**, nenion.* [Rz.60]

- *Ĉu vi konas la enhavon de la dramo? Ĉu ne estas en ĝi io malagrabla? –* ***Ne, ne****; ili nur ŝercas, ili iom venenas ŝerce; nenio malagrabla.* [H.89]

Por respondi laŭ la okcidenta sistemo jese ĉe nea demando, oni povas ankaŭ uzi la emfazan respondon ***Jes*** *ja!* = ***Jes****, tiel ja estas!* (aŭ simile):

- *Ĉu vi ne volas trinki la malvarman kafon? –* ***Jes*** *ja!* (= ***Jes****, mi ja volas trinki ĝin.*)

Kelkaj uzas *Tamen!* (§14.3.17) anstataŭ *Jes ja!* Eventuale *Sed jes!* povas esti plia eblo.

### Orienta sistemo

En la **orienta** sistemo *jes* konfirmas ekzakte tion, kion la demando enhavas, dum *ne* malkonfirmas la tutan demandofrazon. En tiu sistemo *jes* kaj *ne* interŝanĝas rolojn ĉe neaj demandoj kompare kun la okcidenta sistemo.

- *Ĉu vi volas kafon?* (pozitiva demando)
  - – ***Jes****!* (= *Mi volas kafon.*)
  - – ***Ne****!* (= *Mi ne volas kafon.*)
- *Ĉu vi ne volas kafon?* (negativa demando)
  - – ***Jes****!* (= *Mi ne volas kafon.*)
  - – ***Ne****!* (= *Mi ja volas kafon.*)
- *Ĉu ne kafon vi volas?* (parte negativa demando)
  - – ***Jes****!* (= *Ne kafon mi volas.*)
  - – ***Ne****!* (= *Efektive kafon mi volas.*)
- *Ĉu vi volas ne kafon, sed teon?* (parte negativa demando)
  - – ***Jes****!* (= *Mi volas ne kafon, sed teon.*)
  - – ***Ne****!* (= *Efektive kafon mi volas, ne teon.*)
- *Ĉu vi nenion deziras?*
  - *–* ***Jes****, mi nenion deziras.*
  - *–* ***Ne****, mi ja deziras ion.*
- *Tion vi volas, ĉu ne?*
  - *–* ***Jes****, mi ne volas tion.*
  - *–* ***Ne****, mi ja volas tion.*
- *Ĉu vi ne scias, ke li ne alvenis?*
  - *–* ***Jes****, mi ne scias, ke li ne alvenis.*
  - *–* ***Ne****, mi ja scias, ke li ne alvenis.*
- *Ĉu ŝi ne edziniĝis?* [...] *–* ***Jes****, iele tiel fariĝis, ke* [...] *ŝi ne edziniĝis.* [M.102]
- *Kun maldolĉa sento de neplenumita espero vi eble demandos: ĉu en sia lasta kongresa parolo* [...] *li nenion pli havas por diri al ni?* [...] *Ho* ***ne****, miaj karaj amikoj* [...]*! Multe, multe, tre multe mi volus hodiaŭ diri al vi.* [OV.411] *Ne = Mi ja ion pli havas por diri al vi.*

Por respondi (laŭ la orienta sistemo) jese ĉe nea demando, oni eble povas uzi *Tiele!*, se oni volas eviti miskomprenon. Por nea respondo tiam povas eble funkcii la respondesprimo *Male!*

- *Ĉu vi ne volas trinki la malvarman kafon? –* ***Tiele!*** (= *Mi ne volas trinki ĝin.*) – ***Male!*** (= *Mi ja volas trinki ĝin.*)

### Du logikoj

Ambaŭ sistemoj respondi neajn demandojn estas logikaj, sed en tute malsamaj manieroj. Estus bone, se nur unu sistemo ekzistus en Esperanto. Principe oni povas rekomendi la okcidentan sistemon, ĉar ĝi estas ĝis nun la pli ofte uzata, kaj klare la pli ofta ĉe Zamenhof. Sed ŝajnas, ke ne estas eble atingi tute unuecan uzon de unu sola sistemo. Ambaŭ uzoj estas hejmaj en la lingvo.

Oni tial estu singarda pri respondado al negativaj demandoj. Oni prefere aldonu klaran respondfrazon por ne riski miskomprenon:

- *Ĉu vi ne volas kafon?*
  - *– Jes, mi ja volas (kafon)!*
  - *– Jes ja!*
  - *– Ne, mi ja volas (kafon)!*
  - *– Ne, mi ne volas (kafon)!*
  - *– Jes, mi ne volas (kafon)!*

Kelkaj el la ĉi-antaŭaj respondoj sekvas la okcidentan sistemon, dum aliaj sekvas la orientan sistemon, sed ĉiuj estas nemiskompreneblaj pro la aldonitaj klarigaj vortoj.

Iuj opinias, ke oni evitu negativajn demandojn, sed negativaj demandoj estas bezonataj por esprimi specialajn nuancojn. La lingvo malriĉiĝus, se oni ne povus uzi tiajn demandojn.

## Vortfarado

- *Jesa* = "aproba, konsenta", *nea* = "rifuza, malkonsenta": *Ĉu li donis al vi **jesan** respondon aŭ **nean**?* [FE.31]
- *Jesi* = "respondi jese", *nei* = "respondi nee": *Ĉu ili **jesis** aŭ **neis** al via demando?*
- *Neebla* estas (teorie) dusignifa vorto. Oni povas krei ĝin el la verbo *nei* per la sufikso EBL (§38.2.7): *nei* → *neebla* = "tia ke oni povas nei ĝin": *Lia propono estas **neebla**.* = *Estas eble nei lian proponon.* Sed en la praktiko *neebla* preskaŭ ĉiam estas bazita sur la memstara vorto *ebla*, al kiu oni aldonis *ne* prefiksece (§38.4.3): *neebla* = "tia ke ĝi ne povas esti": *Lia propono estas **neebla**.* = *Lia propono ne estas (realig) ebla.* Por eviti miskomprenon oni povas por la unua senco uzi *neadebla* (kun la sufikso AD, §38.2.2). Por la dua senco la pli forta esprimo *malebla* estas alternativo.

- *Jesigi* = "konfirmi", *neigi* = "malkonfirmi": *La novaĵo estis **jesigita/neigita***. Antaŭe oni uzis *jesigi* kaj *neigi* ankaŭ anstataŭ *jesi* kaj *nei*. Prefere oni uzu ilin nur por "konfirmi" kaj "malkonfirmi".

# 23. Nombroj

Por montri nombrojn oni uzas nombrovortojn. Ili estas de du specoj: **nombraj vortetoj**, kiuj povas montri nombrojn de 0 ĝis 999999, kaj **nombraj radikvortoj**, kiuj interalie montras pli altajn nombrojn kaj onojn.

## 23.1. Nombraj vortetoj

### 23.1.1. Nombraj vortetoj — formoj

Ekzistas dek tri nombraj vortetoj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| ***nul*** | 0 | ***dek*** | 10 |
| ***unu*** | 1 | ***cent*** | 100 |
| ***du*** | 2 | ***mil*** | 1000 |
| ***tri*** | 3 | | |
| ***kvar*** | 4 | | |
| ***kvin*** | 5 | | |
| ***ses*** | 6 | | |
| ***sep*** | 7 | | |
| ***ok*** | 8 | | |
| ***naŭ*** | 9 | | |

Aliajn nombrojn oni esprimas per kombinado de la nombraj vortetoj. Oni diras unue kiom da miloj estas, poste kiom da centoj, poste kiom da dekoj, kaj fine kiom da unuoj:

#### Post dek

| | | | |
|---|---|---|---|
| **11** | *dek unu* | **16** | *dek ses* |
| **12** | *dek du* | **17** | *dek sep* |
| **13** | *dek tri* | **18** | *dek ok* |
| **14** | *dek kvar* | **19** | *dek naŭ* |
| **15** | *dek kvin* | | |

#### Dekoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| **10** | *dek* | **60** | *sesdek* |
| **20** | *dudek* | **70** | *sepdek* |
| **30** | *tridek* | **80** | *okdek* |
| **40** | *kvardek* | **90** | *naŭdek* |
| **50** | *kvindek* | | |

## Centoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| **100** | *cent* | **600** | *sescent* |
| **200** | *ducent* | **700** | *sepcent* |
| **300** | *tricent* | **800** | *okcent* |
| **400** | *kvarcent* | **900** | *naŭcent* |
| **500** | *kvincent* | | |

## Miloj

| | | | |
|---|---|---|---|
| **1000** | *mil* | **10 000** | *dek mil* |
| **2000** | *du mil* | **11 000** | *dek unu mil* |
| **3000** | *tri mil* | **12 000** | *dek du mil* |
| **4000** | *kvar mil* | **13 000** | *dek tri mil* |
| **5000** | *kvin mil* | **20 000** | *dudek mil* |
| **6000** | *ses mil* | **30 000** | *tridek mil* |
| **7000** | *sep mil* | **42 000** | *kvardek du mil* |
| **8000** | *ok mil* | **999 000** | *naŭcent naŭdek naŭ mil* |
| **9000** | *naŭ mil* | | |

## Pliaj kombinoj

| | | | |
|---|---|---|---|
| **21** | *dudek unu* | **432** | *kvarcent tridek du* |
| **22** | *dudek du* | **1001** | *mil unu* |
| **23** | *dudek tri* | **1011** | *mil dek unu* |
| **24** | *dudek kvar* | **1111** | *mil cent dek unu* |
| **31** | *tridek unu* | **1234** | *mil ducent tridek kvar* |
| **32** | *tridek du* | **2678** | *du mil sescent sepdek ok* |
| **33** | *tridek tri* | **7777** | *sep mil sepcent sepdek sep* |
| **101** | *cent unu* | **88 888** | *okdek ok mil okcent okdek ok* |
| **110** | *cent dek* | **999 999** | *naŭcent naŭdek naŭ mil naŭcent naŭdek naŭ* |
| **111** | *cent dek unu* | | |

**Noto:** Oni ne diras **unudek** aŭ **unucent**, sed nur *dek* kaj *cent*. Oni povus eble diri *unu mil*, sed normale oni diras simple *mil*.

**Noto:** La sona simileco inter *ses* kaj *sep* povas iafoje esti iom ĝena. Iuj tial uzas en ekz. telefonado *sis°* anstataŭ *ses*. Aliaj uzas samcele *sepen* anstataŭ *sep*. Eble tio estas imitinda en tiaj situacioj, kiam pro bruo aŭ simile oni bezonas eviti miskomprenojn. Oni tamen memoru, ke ankoraŭ malmultaj konas *sis°* kaj *sepen*.

### Kunskribado kaj disskribado

Dekoj kaj centoj kunmetiĝas al unu vorto: *dudek*, *tridek*, *ducent*, *tricent* k.t.p. Ĉio alia estu skribata kiel apartaj vortoj, ankaŭ miloj.

**Noto:** Multaj pensas, ke la regulo estas: "Kunskribu multiplikojn, disskribu adiciojn." La Fundamenta regulo estas tamen alia, kaj pli simpla. Oni sekvu la Fundamentajn regulon kaj ekzemplojn.

Dekoj kaj centoj ricevas same kiel aliaj vortoj akcenton je la antaŭlasta vokalo: ***dú**dek*, ***trí**dek*, ***dú**cent*, ***trí**cent*. Ĉio alia estas elparolata kiel apartaj vortoj: ***dék dú***, ***dék trí***, ***cént dú***, ***cént trí***, ***cént dék dú***, ***dú míl***, ***trí míl***, ***dú míl dék dú***.

Tiu ĉi simpla regulo, kiu troviĝas en la *Fundamento*, estas ofte miskomprenata. Oni erare kunskribas tro multe. Ne skribu: **dekdu**, **dektri**, **centdu**, **centtri**, sed: *dek du*, *dek tri*, *cent du*, *cent tri*. Nek skribu: **dumil**, **trimil**, **dekdumil**, **dudekdumil**, sed: *du mil*, *tri mil*, *dek du mil*, *dudek du mil*. Ankaŭ estus eraro uzi dividostrekojn, kie devas esti spacetoj, ĉar tio, kio estas skribita kun dividostreko estas unu vorto. Tion, kion oni elparolas kiel apartajn vortojn, oni ne skribu kiel unu vorton. Ne skribu do **cent-tridek-du**, sed *cent tridek du*, ĉar neniu elparolas **cent-tridék-du**.

**Noto:** Eĉ ĉe Zamenhof oni trovas multege da erare skribitaj nombrovortoj. Eble iuj el tiuj eraroj vere estis faritaj de tiuj, kiuj kompostis liajn tekstojn.

La kialo, ke oni ne kunskribu milojn, estas, ke antaŭ *mil* povas stari ĉio ajn de *du* ĝis *naŭcent naŭdek naŭ*, do ankaŭ plurvortaĵoj. Antaŭ *dek* kaj *cent* povas aperi nur *du* ĝis *naŭ*. Se oni kunskribus ankaŭ milojn, oni devus skribi ekz. **tricenttridektrimil** (333 000), kio estus tre maloportuna. La ĝusta skribo: *tricent tridek tri mil* estas pli klara. Kompreneble en la praktiko oni preskaŭ ĉiam skribas tiel altajn nombrojn per ciferoj.

En la elparolado preskaŭ ĉiuj obeas al la Fundamenta regulo akcentante tute ĝuste, kaj kompreneble oni devas skribi same kiel oni elparolas.

Se el tiaj ĉi bazaj nombraj esprimoj oni kreas vortkunmetaĵojn, ekz. O-finaĵajn nombrovortojn (§23.2) aŭ A-finaĵajn nombrovortojn (§23.4), oni tamen povas aŭ devas kunskribi, eventuale kun dividostrekoj.

#### *Nul*

*Nul* origine estis O-vorto: *nulo* (nomo de la cifero 0). Sed oni delonge uzas ĝin ankaŭ kiel nombran vorteton sen finaĵo, ekz.: 0,5 = *nul komo kvin* (aŭ *nulo komo kvin*). Tia uzo de *nul* estas eĉ oficialigita (*Aktoj de la Akademio II*, p. 13).

### *Un’*

Iafoje oni povas uzi la mallongigitan formon *un’* (§10.1) anstataŭ *unu*.

## 23.1.2. Nombraj vortetoj — uzado

Nombraj vortetoj plej ofte aperas kiel rektaj priskriboj de O-vortoj montr-ante, kiom da aferoj estas. La nombraj vortetoj tiam ne ricevas la finaĵojn N kaj J:

- *Mi havas nur **unu** buŝon, sed mi havas **du** orelojn.* [FE.12] Kiam *unu* rolas kiel pura nombrovorto, ĝi povas ricevi nek J-finaĵon, nek N-finaĵon.
- *Li promenas kun **tri** hundoj.* [FE.12]
- *Li faris ĉion per la **dek** fingroj de siaj manoj.* [FE.12]
- *Li havas **dek unu** infanojn.* [FE.12]
- ***Sesdek** minutoj faras **unu** horon, kaj **unu** minuto konsistas el **sesdek** sekundoj.* [FE.12]

En iuj specialaj uzoj de *unu* (§23.1.3) oni tamen povas aldoni J-finaĵon kaj N-finaĵon post *unu*.

Oni ne uzu A-finaĵon post la nombrovortoj en ĉi tiaj okazoj, ĉar A-finaĵo post nombra vorteto donas tute alian signifon (§23.4).

Iafoje la O-vorto estas forlasita (subkomprenata):

- *Nu, se vi ne havas **mil*** [rublojn]*, mi petas cent rublojn.* [Rz.65]
- *Kiun el la **tri*** [aferoj/personoj] *vi elektas?*

### *Nul* kiel rekta nombra priskribo

*Nul* povas aperi kiel rekta nombra priskribo, sed tio okazas ordinare nur ĉe mezurunuoj:

- *La frostopunkto de akvo estas **nul gradoj**.* Oni normale skribas *0 gradoj*, sed elparolas tion kiel *nul gradoj*. Legu ankaŭ pri la uzo de J-finaĵo ĉe *nul* kaj malpli: §8.2.4.
- *Karato estas masunuo, kiu egalas al **nul komo du gramoj**.* Normale oni skribas *0,2 gramoj*.
- *Ilia fina rezulto estis **nul poentoj**.*

En aliaj okazoj oni normale uzas *neniu* (§15.1): *Mi havas neniun mal-amikon.* Nur iafoje (en eksperimenta lingvouzo, poezio k.s.) oni povas vidi *nul*, kie normale aperas *neniu* (aŭ *nenia*): *nul homo(j)*, *nul dubo* k.s.

### Memstaraj nombraj vortetoj

Nombraj vortetoj povas ankaŭ aperi memstare en diversaj frazroloj. Ofte ili kondutas O-vortece:

- ***Kvar** aŭ **kvin*** [el la knabinoj] *decidis penetri ankoraŭ pli profunden en la arbaron.* [FA2.88]
- ***Kvin** kaj **sep** faras **dek du**.* [FE.12]
- ***Tridek** kaj **kvardek kvin** faras **sepdek kvin**.* [FE.12]

- *Ilia nombro estas **kvardek tri mil sepcent tridek**.* [Nm.26]
- *Divido per **nul** ne estas permesita.*
- ***Tri** estas duono de **ses**.* [FE.14]
- ***Unu, du, tri**! Nun ni flugu dekstren!* [FA1.208]
- ***Sep** estas sankta nombro.*
- *Kiom vi volas? – Mi volas **du mil**.*
- *Kiom ili estas? – Ili estas **dek du**.*

Legu ankaŭ pri pronomeca *unu* en §23.1.3.

## Nombraj vortetoj kun *da*

Oni ankaŭ povas uzi nombrajn vortetojn kun *da*-esprimo (§12.3.3.1). Tio estas malofta, sed povas esti oportuna, ekz. kiam oni ial volas meti la nombrovorton for de tio, kion ĝi nombras:

- ***Da ĉevaloj** ili havis sepcent tridek ses.* [Neĥ.7] Pli klara ol: *Ĉevalojn ili havis **sepcent tridek ses***. Normale oni tamen dirus: *Ili havis **sepcent tridek ses** ĉevalojn*.

En miksitaj nombroj (§23.3) oni povas bezoni uzi nombrajn vortetojn kune kun *da*.

## Identiga priskribo

Nombraj vortetoj ankaŭ aperas post O-vorto kiel identiga priskribo (§25.2). Tiam ili ne montras nombron, sed numeron aŭ simile:

- *Vidu "Lingvo Internacia" N:o* [numero] ***2**, paĝoj **20–21**.* [OV.218] *= ... numero du, paĝoj dudek ĝis dudek unu.* La nombrovortoj rolas kiel identigaj priskriboj de la vortoj *numero* kaj *paĝoj*.
- *La lingvo internacia Esperanto aperis publike en la fino de la jaro **1887**.* [OV.145] *= ... la jaro mil okcent okdek sep*. *1887* estas identiga priskribo de *la jaro*.
- *Ni loĝas en ĉambro **tricent tridek tri** en tiu hotelo.*
- *La respondo troviĝas sur la paĝo **mil ducent ok**.*

Ofte oni povas anstataŭe uzi A-finaĵan vicordan nombrovorton (§23.4): *la dua numero*, *la jaro 1887-a*, *la tricent-tridek-tria ĉambro*. Sed povas esti diferenco inter vicordo kaj numero. Ekz. *kvara* signifas, ke estis tri aliaj antaŭe en vicordo, dum *numero kvar* signifas, ke la afero havas la ciferon 4 kiel iaspecan "nomon". En ekz. hoteloj ofte mankas numeroj, kaj tial ekz. ĉambro cent ne nepre estas la centa ĉambro. Kaj se oni staras ĉe la fino de strato, oni povas diri, ke domo numero unu ne estas la unua domo, sed la lasta.

Kiam oni uzas ciferojn en esprimoj kiel *paĝo 100*, *la jaro 2010* k.s., oni povas rigardi la ciferan skribon kiel skriban simpligon de A-finaĵa nombrovorto. Tiam oni legas *la paĝo 100* kiel *la paĝo centa* kaj *la jaro 2010* kiel *la jaro du-mil-deka*. Tiel oni iafoje skribas la tagon de monato en datoj: *1*

*Majo = la unua (tago) de Majo*. Sed multe pli ofte oni uzas la skribon *1-a de Majo*.

### 23.1.3. Specialaj uzoj de *unu*

La baza signifo de *unu* estas nombra. Tiu uzo estas klarigita ĉi-antaŭe kune kun la aliaj nombraj vortetoj. Sed *unu* havas ankaŭ kelkajn specialajn signifojn kaj uzojn.

#### *Unu* por sameco, unikeco

Iafoje *unu* havas apud la baza nombra signifo la kroman nuancon, ke temas pri unu sama afero, aŭ ke io estas sola, unika:

- *La loĝantoj de **unu** regno estas samregnanoj, la loĝantoj de **unu** urbo estas samurbanoj, la konfesantoj de **unu** religio estas samreligianoj.* [FE.37] = *La loĝantoj de **unu** sama regno ...*
- ***Unu** leĝo kaj **unu** rajto estu por vi, kaj por la fremdulo, kiu loĝas kun vi.* [Nm.15] Ne estu alia leĝo aŭ alia rajto por la fremdulo.
- *Li akompanis Ibon hejmen kaj dormis kun li en **unu** lito.* [FA3.91] = *... en **unu** sama lito.*

#### *Unu* por individueco

*Unu* estas ofte uzata antaŭ O-vorto por montri individuecon aŭ identecon:

- *Mi neniun nomas, sed ĉi tie troviĝas **unu** kokino, kiu volas senplumiĝi, por bele aspekti; se mi estus koko, mi ĝin malestimus.* [FA3.36] La parolanto scias, pri kiu kokino temas.
- *En **unu** tago, kiam ŝi estis apud tiu fonto, venis al ŝi malriĉa virino.* [FE.15]

Individueca *unu* ofte kontrastas al *(la) alia*:

- *Ŝin trafis **unu** malfeliĉo post <u>la alia</u>.* [FA3.77]
- ***Unu** kokino sidis apud <u>la alia</u>.* [FA3.36]
- *Mi nun iradas de strato sur straton, de **unu** domo al <u>alia</u> kaj mi serĉas.*

#### Pronomeca *unu*

*Unu* estas ankaŭ uzata individuece sen posta O-vorto. Ofte oni povas diri, ke O-vorto estas subkomprenata, sed iafoje aldono de O-vorto nur ĝenus. Tiam *unu* estas uzata pronomece:

- *La pli juna filino* [...] *estis krom tio **unu** el la plej belaj knabinoj, kiujn oni povis trovi.* [FE.11]
- ***Unu** el ili estis juna kaj bela kiel anĝelo.* [M.202]

Tre ofte pronomeca *unu* estas uzata kontraste al *(la) alia* aŭ iafoje al *(la) dua*:

- ***Unu** babilis, <u>alia</u> kantis.* [FA2.134]
- *Ĝojo de **unu** estas ofte malĝojo de <u>alia</u>.* [FA4.25]
- ***Unu** parolis pri avareco, <u>la alia</u> parolis pri vanteco.* [FA4.101]

- *Restis ĉe la patrino du miaj pli junaj fratoj, el kiuj **unu** lernoservas ĉe lignaĵisto, kaj <u>la dua</u> vizitas lernejon.* [M.101]

Legu ankaŭ ĉi-poste pri la esprimo *unu ... la alia*.

### *Unuj*

Kiam individueca aŭ pronomeca *unu* estas uzata pri pluraj individuoj, ĝi ricevas la finaĵon J:

- *En la Adresaro **unuj** nomoj kaj adresoj estas skribitaj per ortografio Esperanta kaj aliaj per la diversaj ortografioj naciaj.* [LR.61]
- *Dum **unuj** artikoloj alportas al nia afero rondon da novaj amikoj, multaj aliaj, skribitaj nelerte, tute perdiĝas sen rezultato.* [OV.93]
- *El ŝiaj multaj infanoj **unuj** estas bonaj kaj aliaj estas malbonaj.* [FE.12]
- ***Unuj*** [studentoj] *kun gaja rideto sur la buŝo, aliaj meditante, aliaj en vigla interparolado, unuope aŭ duope forlasas la universitatan korton.* [M.139]

Nuntempe oni ofte uzas *iuj* anstataŭ individueca aŭ pronomeca *unuj*, kvankam principe *iuj* kaj *unuj* esprimas iom malsamajn nuancojn.

En ekstremaj okazoj eĉ unikeca *unu* povas ricevi J-finaĵon:

- *Mi* [...] *alkalkulas min al* [...] *popolo, kies tuta historia misio konsistas* [...] *en la unuigo de la nacioj en la celado al "unu Dio", t.e. **unuj** idealoj por la tuta homaro.* [L1.106] Ĉiu el la diversaj idealoj estas unika en sia speco. Tia uzo de *unuj* nuntempe apenaŭ aperas. Se tiu ĉi ekzemplo estus verkita hodiaŭ, oni kredeble uzus *la samaj idealoj*.

### *Unujn*

La formo *unu* ne povas ricevi la finaĵon N. Tio estas baza regulo, kiu ĉiam validas, ĉu *unu* montras nombron, ĉu ĝi montras individuecon, ĉu unikecon: *Oni ne vidis eĉ **unu**.* [FA1.118] ***Unu** mi renkontis en Londono, alian en Parizo.* Neniam uzu la formon **unun**.

Sed la formo *unuj* ja povas ricevi N-finaĵon, ĉar *unuj* neniam povas esti nombrovorto. Ĝi ĉiam montras individuecon aŭ unikecon. La formo *unujn* estas tamen bezonata nur treege malofte:

- *Ĉio disiĝis, unuj objektoj venis en **unujn** manojn, aliaj en aliajn manojn.* [FA2.148]
- ***Unujn** mi renkontis en Londono, aliajn en Parizo.*

Kelkaj volas, ke *unu* povu libere ricevi N-finaĵon, kiam ĝi montras individuecon, kaj kiam ĝia frazrolo principe postulas N-finaĵon. Kelkaj eĉ eksperimente praktikas tion: **Oni ne vidis eĉ **unun**.* *Mi trovis nek **unun**, nek la alian.** Estas vero, ke la regulo, kiu malpermesas **unun**, sed permesas *unujn*, estas stranga el vidpunkto de logiko. Sed ĝi estas tre bona el vidpunkto de praktika uzado. En la praktiko la nombra, unikeca kaj individueca uzoj de *unu* ne estas rigore distingeblaj. Estas multaj limokazoj, kaj tial la simpla regulo, ke *unu* neniam havu N-finaĵon, estas tre praktika. Oni ne bezonas cerbumi ĉiufoje, ĉu *unu* montras nombron, unikecon aŭ individu-

econ. *Unuj* tamen ĉiam montras individuecon aŭ unikecon, kaj tial ne estas problemo uzi post ĝi N-finaĵon, se la frazrolo tion postulas. Uzado de **unun** kaŭzus nur konfuzon sen alporti multe da praktika utilo.

### Duondifina artikolo

Individueca *unu* povas montri, ke afero estas konata al la parolanto, sed ne al la aŭskultanto. Tiel estas en kelkaj el la ĉi-antaŭaj ekzemploj. Tiam temas pri duondifina *unu*, kiu estas speco de difinilo (§9.2).

### *Unu*, *iu* kaj *certa*

Ofte oni legas, ke individueca *unu* estas egala al *iu*. Tio ne estas vera. Ambaŭ estas individuecaj vortoj, sed ili montras malsamajn nuancojn.

Individueca *unu* montras, ke la parolanto bone scias, pri kiu individuo li parolas (dum la aŭskultanto kredeble ne scias). *Iu* montras, ke la identeco de la priparolata individuo estas nekonata aŭ neklara, aŭ ke la identeco ne estas grava:

- *Loĝas ĉi tie **unu** el viaj amikoj.* La parolanto scias, kiu el la amikoj ĉi tie loĝas.
- *Loĝas ĉi tie **iu** el viaj amikoj.* La parolanto (verŝajne) ne scias, kiu el la amikoj loĝas ĉi tie.

Ofte oni povas uzi *iu* anstataŭ *unu*, kiam ne estas grave montri, ĉu la individuo estas konata al la parolanto. Sed *unu* estas pli preciza. Ĝi montras, ke la parolanto ja scias la identecon.

*Certa* havas interalie signifon similan al individueca *unu*, sed *certa* estas pli forta. Ĝi emfaze montras, ke io estas certe konata al la parolanto (sed verŝajne ne al la aŭskultanto): *En **certaj** okazoj multe da saĝo estas pli malbona, ol se oni ĝin tute ne havus.* [Rz.9] *La esperantismo estas forte ligita kun **certa** interna ideo.* [OV.377] *Hieraŭ vizitis min **certa** sinjorino Schmidt.*

### Evitado de *unu*

La multspeca uzo de *unu* ŝajnas stranga al iuj, interalie ĉar lernolibroj malofte klarigas ĝin. Tial multaj preferas uzi *unu* nur en pure nombra rolo, kaj preferas por la aliaj signifoj la vortojn *iu(j)*, *kelka(j)* kaj *certa(j)*. Tio estas malriĉigo de la lingvo, ĉar ĉiuj ĉi vortoj esprimas malsamajn nuancojn, kaj ĉiuj tiuj nuancoj estas utilaj.

### *Unu ... la alia*

Pronomeca *unu* estas parto de la esprimo *unu ... (la) alia*, per kiu oni montras reciprokecon. *Unu ... (la) alia* reprezentas tutan mallongigitan frazon. *Unu* normale estas subjekto en la plena frazo, kaj *(la) alia* estas objekto aŭ havas alian nesubjektan rolon:

- *Tiuj gejunuloj amas **unu la alian**. → Tiuj gejunuloj amas. Unu amas la alian.* Ĉiu el ili amas ĉiun alian el ili.
- *Ili donis florojn **unu al alia**. → Ili donis florojn. Unu donis florojn al alia.* Ĉiu el ili donis florojn al ĉiu alia el ili.

- *Li kunigis kvin tapiŝojn **unu kun la alia**.* [Er.36] Li kunigis unu tapiŝon kun la alia.

Oni povas preskaŭ ĉiam uzi *unu ... (la) alia* sen J-finaĵoj. Laŭbezone oni tamen povas aldoni J-finaĵon al *alia* kaj ankaŭ al *unu* depende de la celita senco: *La junaj knabinoj kaj junuloj ĉe la lageto babilas **unuj kun la aliaj**.* [FA4.92] Unuj el ili babilas kun aliaj el ili. Iafoje oni devas uzi la formon *unujn*: *La registaroj ĵetas la homojn **unujn kontraŭ la aliajn**. = La registaroj ĵetas unujn homojn kontraŭ la aliajn homojn.*

### Alternativoj al *unu ... la alia*

Anstataŭ *unu ... la alia* oni povas kelkfoje uzi la vorton *reciproke* kune kun *si* aŭ alia pronomo:

- *La knabino kaj la knabo kisis **sin reciproke**.* [FA2.80] *= La knabino kaj la knabo kisis unu la alian.*
- *Ĉiuj **sin reciproke** komprenas. = Ĉiuj komprenas unu la alian.*
- *Ili **reciproke** turnas **al si** la dorson. = Ili turnas la dorson unu al la alia.*
- *Ni donis **al ni reciproke** la manojn.* [FA3.77]

Oni ankaŭ povas uzi *reciproke* kune kun *unu ... la alia* por emfazi la reciprokecon: *Vi ne estas **reciproke** egalaj **unu al la alia** en la regiono de la spirito.* [FA3.76]

Oni povas ankaŭ uzi *inter* prefiksece ĉe verbo, ofte kune kun *si* aŭ alia pronomo, aŭ la esprimon *inter si* (*inter ni*, *inter vi*), kiu ĉiam signifas *unu kun la alia* aŭ simile:

- *Ili sin **interakuzas**. = Ili akuzas unu la alian.*
- *Ili **interparolas**. = Ili parolas unu kun la alia.*
- *En la interkona vespero la kongresanoj **interkonatiĝas**. = ... la kongresanoj ekkonas unu la alian.*
- *Ili ĉiuj estis tre amikaj **inter si**.* [BV.77] *= Ili ĉiuj estis tre amikaj unu al la alia.*
- *"Lingvo Internacia" kaj "lingvo tutmonda" estas du tute malsamaj objektoj, kiujn miksi **inter si** oni neniel devas.* [FK.259] *= ... miksi unu kun la alia ...*
- *Ni devas **interparoli**. Ni devas paroli **inter ni**. = Ni devas paroli unu kun la alia.*
- *Vi devas bone rilati **inter vi**. = Vi devas bone rilati unu kun la alia.*
- *Ni **reciproke** dividos **inter ni** malĝojon kaj ĝojon.* [FA3.18] *= Ni dividos malĝojon kaj ĝojon unu kun la alia.* Ĉi tie *reciproke* emfazas la reciprokecon.

Oni neniam uzu la pronomon *si* kune kun *unu ... la alia*. Ne diru: **Ili amas **sin** unu la alian.** Diru simple: *Ili amas unu la alian.*

En la esprimo *inter si* (§11.6.3) ne ĉiam validas la normalaj reguloj por *si*.

Iafoje la pronomo *si* sola montras reciprokecon, sed tio estas ebla nur kiam la kunteksto ne lasas dubon pri la senco: *Ili **sin** kisas!* [Rz.79] *= Ili kisas unu la alian! / Sinjoroj **sin** batas, servantoj vundojn ricevas.* [PE.172] *= Sinjoroj batas unu la alian ...*

Iafoje, kiam la kunteksto klare komprenigas, ke temas pri reciproka ago, oni ne bezonas aparte montri tion: *Ili parolis. = Ili parolis unu kun la alia. / La knabino kaj la knabo kisas. = ... kisas unu la alian. / Vi devas bone rilati. = ... rilati inter vi.*

## 23.2. O-vortaj nombrovortoj

Aliaj nombrovortoj ol la nombraj vortetoj (§23.1) estas radikvortoj, kiuj bezonas finaĵon. Baze ili estas uzataj kun O-finaĵo.

### ON-vortoj

Nombrovortoj kun la sufikso ON (§38.2.27) montras partajn nombrojn.

- *duono* = 1/2
- *triono* = 1/3
- *dekono* = 1/10
- *dekduono* = 1/12
- *centono* = 1/100
- *milono* = 1/1000
- *Duono, triono kaj sesono faras unuonon.* 1/2 + 1/3 + 1/6 = 1. *Unuono* estas tamen tre malofta vorto. Ĉi tie oni povas simple uzi *unu*.

Ĉe iaj onoj povas estiĝi konfuzo, se oni ne elparolas tre klare.

- 200/1000 = *ducent milonoj*
- 2/100 000 = *du centmilonoj*

En tiaj okazoj estas necese elparoli kun klaraj paŭzetoj inter la vortoj por eviti miskomprenojn.

### Grandegaj nombroj

| | |
|---|---|
| *miliono* | 1 000 000 (ses nuloj) |
| *miliardo* | 1 000 000 000 (= naŭ nuloj) |
| *biliono* | 1 000 000 000 000 (= dek du nuloj) |
| *triliono* | 1 000 000 000 000 000 000 (= dek ok nuloj) |

Tre malofte uzataj estas *kvadriliono* (24 nuloj), *kvintiliono* (30 nuloj), *sekstiliono°* (36 nuloj), *septiliono°* (42 nuloj), *oktiliono°* (48 nuloj), *noniliono°* (54 nuloj) kaj *deciliono°* (60 nuloj).

**Noto:** Nuraj kuriozaĵoj estas la jenaj apenaŭ uzataj nombrovortoj: *undeciliono°* (66 nuloj), *duodeciliono°* (72 nuloj), *tredeciliono°* (78 nuloj), *kvatuordeciliono°* (84 nuloj), *kvindeciliono°* (90 nuloj), *seksdeciliono°* (96 nuloj), *septendeciliono°* (102 nuloj), *oktodeciliono°* (108 nuloj), *novemdeciliono°* (114 nuloj), *vigintiliono°* (120 nuloj) kaj *centiliono°* (600 nuloj). Vortoj kiel **biliardo*°*, **triliardo*°*, **kvadriliardo*°* k.t.p. tute ne ekzistas en Esperanto (same kiel en plej multaj naciaj lingvoj).

La valoroj de la vortoj *biliono*, *triliono* k.t.p. montrataj ĉi-antaŭe sekvas la tiel nomatan "longan skalon", kiun uzas la plimulto de tiuj lingvoj, kiuj entute uzas tiaformajn nombrovortojn. Sed kelkaj lingvoj, interalie la angla kaj la rusa, donas tute aliajn valorojn al siaj similformaj nombrovortoj uzante la tiel nomatan "mallongan skalon". La Esperantaj vortoj tamen sekvu la plimulton de la lingvoj, kaj havu nur la ĉi-antaŭe montritajn signifojn (kiuj estas la originaj valoroj por tiaj vortoj). *PIV* donas (ekde la jaro 2002) definitivajn longskalajn signifojn por ĉiuj tiaj nombrovortoj.

Vidu ankaŭ la neoficialajn sufiksojn ILION (§39.1.16) kaj ILIARD (§39.1.17). Legu ankaŭ pri prefiksoj de mezurunuoj en §39.3.

### *Nulo*

La O-vorto *nulo* estas nomo de la cifero 0: *Unu miliono estas skribata per unuo kaj ses **nuloj**.* Ĝi povas ankaŭ esti uzata sen finaĵo: *nul* (§23.1.1).

### J-finaĵo kaj N-finaĵo

O-vortaj nombrovortoj ricevas la finaĵojn J kaj N laŭ la samaj reguloj kiel aliaj O-vortoj:

- *Kiam vi havos rikolton, vi donos **kvinonon** al Faraono.* [Gn.47]
- *El multaj **milonoj** fariĝas **milionoj**.* [PE.981]
- *Mi ricevis dudek kvin **centonojn**.*
- *Ŝi havas pli ol dek **milionojn**.*
- *La malprofito atingis sumon de kvardek sep **miliardoj**.*
- *Ŝi vidis pli ol dek **milionojn**.*
- *Post la sumo ŝi alskribis tri **nulojn**.*

### *Da*

O-vortaj nombrovortoj ne povas rekte priskribi O-vorton. Oni devas antaŭ la kalkulata afero meti rolvorteton. Normale oni uzas *da* (§12.3.3.1), sed ankaŭ ekz. *de* (§12.3.2.3) kaj *el* (§12.3.5.2) povas aperi. En tiaj konstruoj la nombrovorto estas ĉefvorto kaj la kalkulata afero estas priskribo de ĝi:

- *Tiu ĉi urbo havas **milionon** <u>da loĝantoj</u>.* [FE.14]
- *Li havas du **miliardojn** <u>da dolaroj</u>.*
- *Ŝi vidis pli ol dek **milionojn** <u>da homoj</u>.*

Kiam oni skribas tiajn nombrajn esprimojn cifere, oni ofte forlasas la vorteton *da* en la skribo: *2 000 000 000 jaroj*. Kiam oni tion laŭtlegas, oni tamen devas eldiri *da*: *du miliardoj da jaroj*. Aparte atentu, se la esprimo rolas kiel rekta objekto: *Ili pagis **30 000 000 enoj**.* = *Ili pagis **tridek milionojn** <u>da enoj</u>.* Kiam oni elparolas la cifere skribitan nombron, oni devas diri *milionojn* kun N-finaĵo, ĉar la nombro *30 000 000* rolas kiel rekta objekto. La vorto *enoj* tamen ne havu N-finaĵon, ĉar antaŭ ĝi staras la rolvorteto *da*, kiun oni tamen elektis ne skribi. Por eviti konfuzon estas pli bone ĉiam skribi *da* en tiaj okazoj: *2 000 000 000 **da** jaroj*, *30 000 000 **da** enoj*.

Ankaŭ ON-vorto kun O-finaĵo bezonas helpan rolvorteton:

- *Unu tago estas **tricent-sesdek-kvinono** aŭ **tricent-sesdek-sesono** de jaro.* [FE.14]

### Nombraj vortetoj kun O-finaĵo

Ankaŭ nombraj vortetoj povas fariĝi O-vortoj. Tiaj O-vortoj montras ian aferon kun rilato al la nombro, aŭ grupon kun tiom da aferoj. Antaŭ O-finaĵo oni ĉiam kunskribas plurvortan nombrovorton. Por klareco oni povas uzi dividostrekojn, kie origine estis spacetoj:

- *unu* → *unuo* = la cifero 1, baza kalkulelemento, elementa kvanto (ekz. metro, kilogramo, ampero k.t.p.)
- *du* → *duo* = la cifero 2, paro, duopo
- *dek du* → *dek-duo* aŭ *dekduo* = la nombro 12, grupo de 12 aferoj
- *dudek tri* → *dudek-trio* aŭ *dudektrio* = la nombro 23, grupo de 23 aferoj
- *kvarcent* → *kvarcento*
- *du mil kvincent* → *du-mil-kvincento* (prefere ne *dumilkvincento*)
- *Li iris kaj stariĝis al la ekzameno kaj alportis hejmen jam ne "**duon**" sed "**kvaron**" kaj "**kvinon**".* [Gm.56] Temas pri sistemo de lernejaj notoj. *Kvaro* = "bone", *kvino* = "bonege".

Ankaŭ ĉi tiaj O-vortoj bezonas *da* por mezuri ion:

- *Mi aĉetis **dekon** da ovoj.* [FE.32]
- *Mi aĉetis **dekduon** (aŭ **dek-duon**) da kuleroj kaj du **dekduojn** da forkoj.* [FE.14]
- *Mi havas **centon** da pomoj.* [FE.14]

### Malnova uzo

En la plej unua tempo oni uzis O-vortajn nombrovortojn kiel rektajn priskribojn sen *da*. Tio ne plu estas ebla: *Mi, subskribita, promesas ellerni la proponitan de d-ro Esperanto lingvon internacian, se estos montrita, ke **dek milionoj** personoj donis publike tian saman promeson.* [UL.31] Nun oni devas diri *dek milionoj da personoj*. Ankaŭ *kiom* kaj *tiom* komence uziĝis en tia maniero: §24.4.

## 23.3. Miksitaj nombroj

Kiam oni miksas nombrajn vortetojn (§23.1) kaj O-vortajn nombrovortojn (§23.2) en unu nombro, iliaj malsamaj reguloj kolizias. Nombraj vortetoj volas esti rektaj priskriboj de ĉefvorto, dum O-vortaj nombrovortoj mem estas ĉefvortoj kun *da*-esprimo post si. Estas necese iel elturniĝi:

- *Kvar metroj da tiu ĉi ŝtofo kostas naŭ frankojn; tial du metroj kostas **kvar kaj duonon** frankojn (aŭ da frankoj).* [FE.14] Pli oportune: *...kostas kvar frankojn kaj duonon (da frankoj)*. Nuntempe oni ofte preferas uzi ON-vorton kun A-finaĵo en ĉi tiaj okazoj: *kvar kaj duonan frankojn*.

- *Tie loĝas 1.000.000 da homoj.* = *... unu miliono da homoj. Tie loĝas 500.000 homoj.* = *... kvincent mil homoj. Tie loĝas* ***1.500.000 (da) homoj***. = *Tie loĝas* ***unu miliono (kaj) kvincent mil (da) homoj***. Oni ankaŭ povas diri: *... unu kaj duona milionoj da homoj*. Aŭ: *... unu komo kvin milionoj da homoj.*
- *Mi havas unu milionon da eŭroj. Se mi ricevos ankoraŭ unu eŭron, mi havos* ***unu milionon unu da eŭroj***. Aŭ: *...* ***unu milionon (da eŭroj) kaj unu eŭron***. Sed prefere ne _*... unu milionon unu eŭrojn*_, ĉar tio estus gramatike tre stranga kun du malsamspecaj objektoj. Estas tre nekutime uzi *da* kune kun nombra vorteto (*unu da eŭroj*), sed tio estas tamen akceptebla en tiaj ĉi okazoj.
- *Li havas 10.300.978 $.* = *Li havas* ***dek milionojn tricent mil naŭcent sepdek ok da dolaroj***. Aŭ: *Li havas* ***dek milionojn (da dolaroj) kaj tricent mil naŭcent sepdek ok dolarojn***.

  **Noto:** Ofte aperas la ideo transformi nombrovortojn kiel *miliono* kaj *miliardo* en nombrajn vortetojn (sen O-finaĵo): _*milion*_, _*miliard*_, _*bilion*_ k.t.p. Tio estus tro drasta ŝanĝo de la lingvo (kaj _*miliard*_ estus tre malfacile elparolebla). Leviĝus ankaŭ la demando, kiel akcenti la novajn vortojn. Ĉu oni diru _*milíon*_ (laŭ la normala akcentoregulo), aŭ _*milión*_ (kontraŭ la regulo)? Oni rimarku, ke _*milíon*_ konfuziĝus kun la vorto *milio* + N-finaĵo. Se oni uzas apostrofon, *milión'*, la vorto restas O-vorto, kaj oni tamen devas uzi *da* (kaj iafoje J kaj N). Aliaj proponis _*miljon*_, _*miljard*_, _*biljon*_ k.t.p., kiuj havus akcenton je "i".

## 23.4. A-vortaj nombrovortoj

### Nombraj vortetoj kun A-finaĵo

Se oni aldonas la finaĵon A al nombra vorteto, oni kreas A-vorton, kiu montras **pozicion en vicordo**. Ordinara A-vorto povas havi diversajn signifojn (§37.2.2) laŭ la kunteksto, sed nombra vorteto kun A-finaĵo ĉiam montras vicordon:

- *unua* = en pozicio numero unu en vicordo (havanta neniun antaŭ si)
- *dua* = en pozicio numero du en vicordo (havanta unu antaŭ si)
- *tria* = en pozicio numero tri en vicordo (havanta du antaŭ si)
- *kvara* = en pozicio numero kvar en vicordo (havanta tri antaŭ si)
- *deka* = en pozicio numero dek en vicordo (havanta naŭ antaŭ si)

Vicordaj nombrovortoj ricevas J-finaĵon kaj N-finaĵon same kiel ordinaraj A-vortoj:

- *La* ***sepan*** *tagon de la semajno Dio elektis, ke ĝi estu pli sankta, ol la ses* ***unuaj*** *tagoj.* [FE.12]

Se oni aldonas A-finaĵon al plurvorta nombro, oni prefere kunmetu la tuton en unu vorton, sed ankaŭ plurvorta skribo estas regula. La A-finaĵon oni aldonas fine. Se oni kunmetas, oni por klareco prefere skribu dividostrekojn tie, kie estas spacetoj en la origina plurvorta nombro:

- *Januaro estas la unua monato de la jaro, Aprilo estas la kvara, Novembro estas la* ***dek-unua***, *Decembro estas la* ***dek-dua***. [FE.12] = *... dek unua ... dek dua.*

- *La **dudeka** (tago) de Februaro estas la **kvindek-unua** tago de la jaro.* [FE.12] *= ... kvindek unua ...*
- *Hodiaŭ estas la **dudek sepa** (tago) de Marto.* [FE.12] *= ... dudek-sepa ...* (aŭ *... dudeksepa ...*)
- *Georgo Vaŝington estis naskita la **dudek duan** de Februaro de la jaro **mil sepcent tridek dua**.* [FE.12] *= ... dudek-duan ... mil-sepcent-tridek-dua.* Anstataŭ *dudek-duan* oni povas skribi ankaŭ *dudekduan*, sed anstataŭ *mil-sepcent-tridek-dua* oni ne skribu **milsepcenttridekdua**, ĉar tio estas tro malklara.
- *Tio okazis en la **kvindekaj** jaroj. = ... iam en la jaroj de 1950 ĝis 1959 inkluzive.*

Iuj opinias, ke kunmetado estas deviga, kiam oni aldonas A-finaĵon, sed la *Fundamento* uzas ambaŭ skribmanierojn. Kunmetado kun dividostrekoj estas pli klara kaj ankaŭ pli logika, sed la elekto estas libera.

Kun O-finaĵo (§23.2), kaj kun la sufiksoj OBL, ON kaj OP (§38.2.26) oni ĉiam devas kunskribi ĉi tiajn nombrojn.

Kiam oni uzas vicordan esprimon apud nombra vorteto, oni metu la vicordan esprimon unue por klareco:

- *Tio okazis iam en la **unuaj dek** tagoj.* Se oni dirus *la dek unuaj tagoj* estus risko, ke oni komprenus *dek* kiel parton de la vicorda esprimo, do kiel *la dek-unuaj tagoj*.

### ON-vortoj kun A-finaĵo

ON-vortoj kun A-finaĵo estas ordinaraj A-vortoj:

- *duona* = havanta nur duonon de sia plena grandeco
- *triona* = havanta nur trionon de sia plena grandeco
- *centona* = havanta nur centonon de sia plena grandeco
- *Ĝi estas longa je **duona** metro.* Ĝia longo estas 50 centimetroj.
- ***Kvaronan** horon li restis.* Li restis dek kvin minutojn.

### Grandegaj nombroj kun A-finaĵo

Ankaŭ nombrovortoj kiel *miliono*, *miliardo*, *biliono* k.t.p. (§23.2) povas ricevi A-finaĵon. Tiaj A-vortoj povas havi diversajn signifojn laŭ la kunteksto:

- *Ĉiu el vi eble sekvas kun intereso la malfacilan bataladon en la granda **multemiliona** lando.* [OV.369] *= ... lando kun multaj milionoj da loĝantoj.*
- *Por **duonmiliona** armeo oni bezonas almenaŭ cent kvindek regimentojn. = Por armeo kun duona miliono da soldatoj ...*
- *Pro la rapida inflacio aperis **centbilionaj** monbiletoj. = ... monbiletoj kun la valoro cent bilionoj.*
- *Nia **miliona** kliento ricevos specialan donacon.* Vicorda signifo.

### Nula

*Nulo* (§23.1.1) origine estis ordinara O-vorto. Tial *nula* estas ordinara A-vorto, kiu povas esti uzata kun diversaj signifoj laŭ la kunteksto. Plej ofte la signifo estas "neekzistanta", "senvalora" aŭ "nevalida":

- *Bruo potenca, **nula** esenco.* PE.548
- *La rezulto estis **nula**.*
- *Tio okazis je la **nula** horo kaj tridek minutoj*. Vicorda signifo.

### Miksitaj nombroj kun A-finaĵo

Ankaŭ vicordaj A-vortoj el miksitaj nombroj (§23.3) estas eblaj: *nia du-milion-unua kliento*, sed kredeble oni prefere uzu esprimojn kun *numero*: *nia kliento numero du milionoj unu*.

## 23.5. E-vortaj nombrovortoj

Nombraj vortetoj kun E-finaĵo havas la samajn vicordajn signifojn kaj la samajn skriboregulojn kiel la respondaj A-formoj (§23.4):

- *unue* = en la unua pozicio
- *due* = en la dua pozicio
- *dek-due*, *dek due* = en la 12-a pozicio
- *naŭcent-naŭdek-naŭe* = en la 999-a pozicio
- ***Unue** mi redonas al vi la monon, kiun vi pruntis al mi; **due** mi dankas vin por la prunto; **trie** mi petas vin ankaŭ poste prunti al mi, kiam mi bezonos monon.* FE.14
- *Kiu venis **unue**, muelas pli frue.* PE.882

### Aliaj nombrovortoj kun E-finaĵo

Se oni uzas E-finaĵon ĉe nombrovorto, kiu baze estas O-vorto (§23.2), oni ricevas ordinaran E-vorton (§6), kiu povas esti uzata kun diversaj signifoj laŭ la kunteksto. En la praktiko preskaŭ nur ON-vortoj estas uzataj tiamaniere:

- *Ĝi estas **trione** el plasto, **trione** el ligno, kaj **trione** el metalo.*
- *Tiu monto estas eĉ ne **centone** tiel alta kiel Ĉomolungmo. = La alteco de tiu monto estas eĉ ne unu centono de la alteco de Ĉomolungmo (= Everesto).*
- *Iele, iome, **duone** malbone.* PE.560

## 23.6. Nuanciloj de nombraj kaj kvantaj vortoj

### Rolvortetoj kiel nuanciloj de nombro aŭ kvanto

La rolvortetoj *ĉirkaŭ* (§12.3.4.4), *de* (§12.3.2), *ĝis* (§12.3.5.3), *inter* (§12.3.4.7), *sub* (§12.3.4.11), *super* (§12.3.4.12) kaj *po* (§12.3.6.8) povas uziĝi kun nombraj aŭ kvantaj vortoj por ilin nuanci en diversaj manieroj:

- *Restas **ĉirkaŭ** <u>dek</u> personoj.* Rz.43 *= Restas proksimume dek personoj.*

- ***Ĝis*** *ducent homoj povas eniri. = Maksimume ducent homoj povas eniri.*
- *Ili kostas* ***de*** *kvin* ***ĝis*** *dek eŭrojn. = Ili kostas minimume kvin kaj maksimume dek eŭrojn.*
- *Mi vidis* ***inter*** *cent kaj ducent homojn. = Mi vidis minimume cent kaj maksimume ducent homojn.*
- *Aranĝu ilin en du vicoj,* ***po*** *ses en vico.* [Lv.24] *= Aranĝu ilin en du vicoj, ses en ĉiu vico.*
- *La temperaturo estis* ***sub*** *nul. = La temperaturo estis malpli alta ol nul gradoj.*
- *Li havas* ***super*** *mil eŭrojn. = Li havas pli ol mil eŭrojn.*

*Super* kaj *sub* estas en la praktiko tre malofte uzataj kiel nuancilo de nombro aŭ kvanto. Ili estas menciitaj ĉi tie nur por kompleteco. Normale oni uzas *pli ol* kaj *malpli ol* respektive.

En ĉi tiaj frazoj la rolvortetoj neniel koncernas eventualan postan O-vorton, sed havas sencon nur por la nombro. Se oni forprenas la nombrovorton, ankaŭ la nuancilo devas malaperi, ĉar ĝi ne plu havas sencon:

- *Restas* ***ĉirkaŭ*** *dek personoj.* [Rz.43] *→ Restas personoj.* (**Restas* ***ĉirkaŭ*** *personoj** ne havas sencon.)
- *Mi vidis* ***inter*** *cent kaj ducent homojn. → Mi vidis homojn.* (**Mi vidis inter homojn** ne havas sencon.)

Oni vidas, ke tiuj ĉi rolvortetoj ne montras frazrolon, kiam ili nuancas nombron aŭ kvanton. Ili ne estas rolmontriloj, sed havas ian E-vortecan rolon. *Ĉirkaŭ*, *de*, *ĝis*, *super* kaj *sub* estas eĉ interŝanĝeblaj kun E-vorto aŭ esprimo kun E-vorteca vorteto: *ĉirkaŭ* = *proksimume*, *de* = *minimume*, *ĝis* = *maksimume*, *super* = *pli ol*, *sub* = *malpli ol*.

## Nuanciloj antaŭ subjekto

Tiaj ĉi nuanciloj povas aperi antaŭ subjekto:

- *Supre sur latoj kaj stangoj sidis* ***ĉirkaŭ*** *cent kolomboj.* [FA2.68] *Ĉirkaŭ cent kolomboj* estas subjekto de *sidis*. Subjekto ne havu rolmontrilon. *Ĉirkaŭ* do ne montras frazrolon ĉi tie. Ĝi rilatas nur al la nombro.
- *El ĉiuj rampaĵoj de la tero laŭ iliaj specoj,* ***po*** *paro el ĉiuj eniru kun vi.* [Gn.6] Subjekto de *eniru* estas *po paro*. *Po* do ne povas esti rolmontrilo ĉi tie, ĉar subjekto estu sen rolmontrilo.

## Nuanciloj kune kun veraj rolmontriloj

Nombrovortaj nuanciloj povas aperi kune kun veraj rolmontriloj, kiuj montras la frazrolon de la tuta esprimo:

- *Ĝi estis virino, kiu povis havi la aĝon de* ***ĉirkaŭ*** *sesdek jaroj.* [M.22] *Ĉirkaŭ* koncernas nur la nombron *sesdek*. *De* montras la frazrolon de la tuta esprimo *ĉirkaŭ sesdek jaroj*.
- *Nenie en la* ***ĉirkaŭ*** *cent jaroj la loko estis pli ŝanĝita, ol en unu malgranda frukta ĝardeno.* [BV.13] La tempa komplemento havas la rolvorteton *en*. *Ĉirkaŭ* estas nura nuancilo de la nombro *cent*.

- *Li havas aĝon de **ĉirkaŭ** 50 jaroj.* La tuta esprimo *de ĉirkaŭ 50 jaroj* estas priskribo de la vorto *aĝon*. La rolvorteto *de* ligas la priskribon al ĝia ĉefvorto. *Ĉirkaŭ* nur nuancas la nombron.
- *Li povas kuŝi ok **ĝis** naŭ jarojn.* H.150 La frazparto *ok ĝis naŭ jarojn* estas tempodaŭra komplemento, kiu devas havi ian rolmontrilon. Ĉi tie ĝi havas N-finaĵon. *Ĝis* nur nuancas la nombrojn.
- *Estis tiel malvarme, ke ili devis kuŝi sub **po** tri kovriloj.* La frazparto *sub po tri kovriloj* estas loka *sub*-komplemento. *Po* nur estas nuancilo de *tri*.
- *Li havas **ĉirkaŭ** mil eŭrojn.* La objekto *ĉirkaŭ mil eŭrojn* bezonas la finaĵon N. *Ĉirkaŭ* nur nuancas la nombron *mil*.

### Neunueca uzo

Se oni opinias, ke tiaj ĉi nuanciloj ne estas rolmontriloj, tiam oni ja uzas N kaj aliajn rolmontrilojn kune kun ili, kiam tio estas bezonata. La ĉi-antaŭaj klarigoj estas verkitaj laŭ tia opinio. Sed se oni tamen opinias, ke ili estas veraj rolmontriloj, tiam oni neniam uzas la finaĵon N kune kun ili, kaj ankaŭ forlasas diversajn aliajn rolmontrilojn.

Zamenhof hezitis pri la afero. Li iafoje uzis tiajn ĉi nuancilojn kiel verajn rolmontrilojn forlasante la finaĵon N ekz. ĉe objektoj. Alifoje li uzis ilin laŭ la ĉi-antaŭaj klarigoj. La nuancilon *ĉirkaŭ* li uzis en ambaŭ manieroj. La nuancilon *po* li uzis normale nur kiel rolmontrilon, sed li skribis, ke ankaŭ uzado kun N estas bona (*Lingvaj Respondoj* p. 70, n-ro 79). Li eĉ mem uzis *po* en tia maniero almenaŭ unu fojon. La aliajn nuancilojn Zamenhof uzis tiel malofte, ke estas malfacile diri, kiajn regulojn li sekvis. Unueca principo por ĉiuj ĉi nuanciloj ne estas do trovebla ĉe Zamenhof:

- *Ŝi sidis tie **ĉirkaŭ** dek minutoj.* M.180 La tempodaŭra komplemento ne havas alian rolmontrilon ol *ĉirkaŭ*.
- *La sola presado de nia gazeto kostas **ĉirkaŭ** 500 rublojn ĉiujare.* OV.126 La kosta komplemento havas la rolfinaĵon N. *Ĉirkaŭ* estas do nur nuancilo de nombro ĉi tie.
- *Li povas veni nur sufiĉe malfrue — **ĉirkaŭ** horo antaŭ noktomezo.* BV.69 *Ĉirkaŭ* rilatas al subkomprenita *unu*, sed ĝi estas ĉi tie ankaŭ la sola rolmontrilo de *horo*.
- *Ekzistas ankaŭ* [...] *lernolibroj, kiuj* [...] *kostas **de** 15 **ĝis** 50 centimoj por ekzemplero.* OV.163 La kosta komplemento ne havas N-finaĵon.
- *Al ĉiu el la infanoj mi donis **po** tri pomoj.* FE.14 La objekto *tri pomoj* ne havas N-finaĵon. *Po* estas do iel rolmontrilo de objekto ĉi tie.
- *Al ĉiu el la laborantoj li donis **po** kvin dolarojn.* DL.18
- *Ŝi ricevis iel du lecionojn **po dudek** spesdekoj por horo.* M.102 = *... por po dudek spesdekoj por horo*. Normale oni uzas *por* en ĉi tiaj esprimoj, ĉar temas pri prezo, sed ĉi tie *po* transprenis ankaŭ la rolon de *por*.
- *Jen estas la fajrofero, kiun vi devas alportadi al la Eternulo:* [alportu] *ŝafidojn jaraĝajn sendifektajn **po** du en ĉiu tago, kiel konstantan bruloferon.* Nm.28 En tiu ĉi ekzemplo Zamenhof ja uzis N-finaĵon kune kun *po*,

kvankam li normale ne faris tion. Sed la vortordo estas nekutima (la nombra esprimo *po du* staras post la O-vorta esprimo), kaj oni povas diri, ke *po du* estas aparta komplemento ĉi tie.

Nuntempe oni kutime uzas ĉiujn ĉi vortetojn nur kiel nuancilojn en tiaj esprimoj, do ne kiel rolmontrilojn – escepte de *po*. Pri *po* la lingvouzo varias. Iuj sekvas la zamenhofan (kaj Fundamentan) modelon, aliaj sekvas la samajn regulojn kiel por ekz. *ĉirkaŭ*.

### Konkludo

Por *ĉirkaŭ*, *de* kaj *ĝis* la afero ŝajnas klara. Kiam ili estas nuanciloj de nombro aŭ kvanto, ili ne estu rigardataj kiel rolvortetoj. Se la tuta frazparto bezonas rolmontrilon (N aŭ rolvorteton), oni uzu tian.

Pri *po* oni tamen povas agi laŭplaĉe. Pro la zamenhofa kaj Fundamenta uzo restas ĉiam regule uzi *po* kiel rolmontrilon de la posta esprimo. Oni do povas ĉiam forlasi N post *po*. Tio iafoje povas esti konfuzokrea (ekz. kiam mankas N-finaĵo ĉe objekto). Alifoje tio estas eleganta. Oni povas ankaŭ ĉiam uzi *po* kiel nuran nuancilon almetante ĉiam la bezonatajn rolmontr-ilojn. Tio estas tre klara, sed iafoje povas esti iom peza. Apenaŭ havas sencon disputi pri tio, kiu el la du uzoj estas preferinda. Praktike ambaŭ bone funkcias.

Ĉe tiaj esprimoj de prezo, en kiuj oni normale uzas *por*, la zamenhofa uzado de sola *po* estas rekomendinda: *Ili vendas oranĝojn* ***po*** *kvar eŭroj por kilogramo.* Diri *por po kvar eŭroj* ne estas eraro, sed tio estas malpli el-eganta esprimo.

**Noto:** Laŭ *PAG* oni ankaŭ povas uzi *po* prefiksece ĉe nombrovortoj: **po-du**, **pocent**. Tio estas komplete erara kaj evitenda. Se oni tiel uzus *po*, oni devus same uzi *ĉirkaŭ* kaj aliajn nuancilojn de nombro: **ĉirkaŭ-du**, **ĝis-cent** k.t.p.

### *Pli ol, malpli ol*

Nombra aŭ kvanta esprimo povas havi *pli ol* aŭ *malpli ol* kiel nuancilon:

- *Ĝi estos konstruata* ***pli ol tri*** *jarojn.* [FE.25] *Pli ol tri* = "nombro kiu superas tri".
- *Vi devas kuri* ***pli ol cent*** *mejlojn.* [FA2.71]
- *Ĉiu ligorajta grupo esperantista sendas al la Kongreso siajn delegitojn, kiuj devas havi la aĝon de* ***ne malpli ol 21*** *jaroj.* [L1.133]
- ***Malpli ol duonon*** *da horo oni bezonis por transveturi la golfon.* [FA4.180]
- *Tio estis terura turmento, sed ĝi daŭris* ***ne pli ol sekundon****.* [M.183]
- *Tiam oni vidas* ***pli ol milon*** *da strangaj bestetoj, kiujn oni ordinare neniam vidas en la akvo* [FA2.150]

*Pli ol* aŭ *malpli ol* rolas simile kiel nuancilo ankaŭ antaŭ nenombraj kaj nekvantaj esprimoj (§20.1.2).

## 23.7. Matematikaj esprimoj

| Formulo | Elparolo |
|---|---|
| $2 + 2 = 4$ | *Du kaj du faras kvar.* / *Du plus du estas kvar.* |
| $10 - 3 = 7$ | *Dek minus tri faras sep.* |
| $22 \times 6 = 132$ | *Dudek du multiplikite per ses faras cent tridek du.* / *Dudekduoble ses estas cent tridek du.* / *Dudek du oble ses egalas al cent tridek du.* |
| $7:2 = 3{,}5$ | *Sep dividite per du faras tri komo kvin.* |
| 46,987 | *kvardek ses komo naŭ ok sep* (ne **... komo naŭcent okdek sep**) |
| $10^2 = 100$ | *La dua potenco de dek estas cent.* / *Dek kvadrate estas cent.* |
| $5^3 = 125$ | *La tria potenco de kvin estas cent dudek kvin.* / *Kvin kube estas cent dudek kvin.* |
| $\sqrt{4} = 2$ | *La kvadrata (aŭ dua) radiko de/el kvar estas du.* |
| $\sqrt[3]{27} = 3$ | *La tria (aŭ kuba) radiko de/el dudek sep estas tri.* |

- *Kvin kaj sep faras dek du.* FE.12
- *Dek kaj dek faras dudek.* FE.12
- *Kvar kaj dek ok faras dudek du.* FE.12
- *Tridek kaj kvardek kvin faras sepdek kvin.* FE.12
- *Kvinoble sep estas tridek kvin.* FE.14

Egal(ec)o-signon (=) oni povas elparoli kiel *faras* aŭ *estas* aŭ *egalas (al)*, pli-malpli laŭplaĉe: *du kaj du **faras** kvar*, *dek minus tri **estas** sep*, *du oble du **egalas (al)** kvar*. *Faras* estas uzata en la *Fundamento*, sed *estas* aŭ *egalas (al)* estas hodiaŭ pli oftaj.

En Esperanto oni ordinare uzas decimalan komon, ne decimalan punkton: 12,34 = *dek du komo tri kvar*.

Legu pli pri la vortetoj *plus* kaj *minus* en §16.4.

### Faka lingvaĵo

La ĉi-antaŭaj manieroj elparoli matematikajn esprimojn estas uzataj en ordinara lingvaĵo. Matematikistoj povas bezoni pli mallongajn esprimojn. Diversaj uzoj kaj proponoj ekzistas, sed la speciala faka matematika lingvaĵo ankoraŭ ne estas unueca.

## Diversaj mezuroj

| Formulo | Elparolo |
|---|---|
| 9403,5 km | *naŭ mil kvarcent tri komo kvin kilometroj* / *naŭ mil kvarcent tri kaj duona kilometroj* / *naŭ mil kvarcent tri kilometroj kaj duono (da kilometro)* |
| 8,6 kg | *ok komo ses kilogramoj* / *ok kilogramoj (kaj) sescent gramoj* |
| +37,7° | *(plus) tridek sep komo sep gradoj* / *tridek sep komo sep gradoj super nulo* |
| 49,75 USD | *kvardek naŭ komo sep kvin (Usonaj) dolaroj* / *kvardek naŭ (Usonaj) dolaroj (kaj) sepdek kvin cendoj* |
| 210 × 297 mm (formato A4) | *ducent dek (milimetroj) oble ducent naŭdek sep milimetroj* |

Vortojn por subunuoj kiel *gramoj* kaj *cendoj* oni povas iafoje subkompreni en tiaj ĉi esprimoj: *tri kilogramoj (kaj) sepcent*, *kvar dolaroj (kaj) sepdek kvin*. Sed oni atentu, ke ne estiĝu dubo, pri kia subunuo temas.

## Frakcistreko

Frakcistreko (la simbolo /) estas elparolata per du vortetoj. La unua estas *po* (§12.3.6.8), kaj la dua povas preskaŭ ĉiam esti *por* (§12.3.6.9), sed ankaŭ ekz. *en*, *sur*, *je* kaj *per* estas uzeblaj, laŭ la kunteksto. Rimarku, ke *po* staras antaŭ la tuta esprimo:

| Formulo | Elparolo |
|---|---|
| 20$/kg | ***po** dudek dolaroj **por** kilogramo* |
| 120 km/h | ***po** cent dudek kilometroj **en/por** horo* |
| 2 MN/m² | ***po** du meganeŭtonoj **sur/por** kvadratmetro* |

Ofte oni ankaŭ povas uzi *po* kune kun E-komplemento: ***po** 120 kilometroj **hore***.

Iafoje oni povas forlasi *po* en tiaj ĉi esprimoj, eventuale aldonante *ĉiu*, ekz.: *cent dudek kilometroj por/en (ĉiu) horo*, *dudek dolaroj por (ĉiu) kilogramo*, *du meganeŭtonoj por/sur (ĉiu) kvadratmetro*.

Kelkaj deziras unuecan manieron elparoli frakcistrekojn. Oni volas uzi nur unu vorteton, kiu troviĝu en la loko de *por*, *en* kaj *sur* en la ĉi-antaŭaj ekzemploj. Laŭ la zamenhofa uzado *por* havas tian ĝeneralan signifon: *Vi povas lasi ĉe vi por la vendado* [...] *po 20 kop.* [= kopekoj] ***por ekzemplero***.[OV.552] Sed *por* povus iafoje esti miskomprenata. Do ne ekzistas vorto, kiun oni povus absolute ĉiam uzi. Iuj volas tiel uzi *po*, sed la signifo de *po* ne permesas tion. Kaj Zamenhof, kaj la Akademio de Esperanto (*Aktoj de la Akademio II*, p. 56) atentigis, ke tia uzado de *po* estas erara. Zamenhof

skribis: *Oni ne povas diri "je 80 centimoj po funto" aŭ "30 mejlojn po horo", sed oni devas diri "po 80 centimoj por (ĉiu) funto", "po 30 mejloj en horo".* LR.137

## 23.8. Horoj

Por montri horon oni sekvu iun el la ĉi-postaj modeloj. La vortojn *horo* kaj *minutoj* oni tre ofte nur subkomprenas:

| **Cifere** | **Elparole** |
|---|---|
| 3:15 (aŭ 15:15) | *Estas la tria (horo) (kaj) dek kvin (minutoj). / Estas dek kvin (minutoj) post la tria (horo).* |
| 9:45 (aŭ 21:45) | *Estas la naŭa (horo) (kaj) kvardek kvin (minutoj). / Estas dek kvin (minutoj) antaŭ la deka (horo).* |

Por plia klareco oni povas aldoni la esprimojn *en la antaŭtagmezo* aŭ *antaŭtagmeze* (mallongigo: *atm.*), kaj *en la posttagmezo* aŭ *posttagmeze* (mallongigo: *ptm.*). Sed oni ankaŭ povas uzi la 24-horan sistemon:

- *Estis la dek-kvina (kaj) dek kvin. / Estis dek kvin post la dek-kvina.*
- *Estis la dudek-unua (kaj) kvardek kvin. / Estis dek kvin antaŭ la dudek-dua.*

Se oni skribas horon cifere ene de plena frazo, oni ordinare ne skribas la vorton *la* antaŭ la horo. En la elparolata formo *la* ĉiuokaze devas aperi: *Estas nun 4:10 posttagmeze. = Estas nun la kvara horo kaj dek posttagmeze. / Estas nun dek minutoj post la kvara ptm.*

Anstataŭ *15 minutoj* oni povas uzi *kvarono*, *kvaronhoro* aŭ *kvarona horo*. Anstataŭ *30 minutoj* oni ofte uzas *duono*, *duonhoro* aŭ *duona horo*.

**Noto:** Anstataŭ *20 minutoj* oni tamen ne uzas *trionhoro* aŭ simile, kvankam tio estus tute logika.

Ne uzu *de* anstataŭ *post* aŭ *antaŭ* en horesprimoj. Ne diru **duono de la naŭa**. Diru *duono antaŭ la naŭa* aŭ *duono post la naŭa* depende de la celata signifo.

### Demandoj pri horo

Horojn oni montras per vicordaj nombrovortoj kun A-finaĵo: *tria*, *naŭa*, *dek-dua* k.t.p. Por demandi pri horo oni do uzas la demandvorton *kiom* (§14.3.3) + A-finaĵo → ***kioma***.

- ***kiom?*** → *tri*, *naŭ*, *dek du*, *dudek unu*...
- ***kioma?*** → *tria*, *naŭa*, *dek-dua*, *dudek-unua*...
- ***Kioma*** *horo estas, gardisto?* FA1.127
- ***Kioma*** *horo estis, kiam vi alvenis?*

**Noto:** Ankaŭ ekzistas la slanga esprimo *kiomas?* = "kioma horo estas?" Oni ne uzu ĝin en serioza kunteksto.

### Rolmontriloj de horo

Por montri, kiam io okazas, oni devas uzi rolmontrilon, normale *je*, *antaŭ*, *post*, *ĝis* aŭ *ĉirkaŭ*:

- ***Je** (la) kioma horo okazis tio?*
- *Tio okazis **je** la tria kaj kvardek.*
- *Ŝi venos **je** la sepa kaj duono.*
- *Ni devas manĝi **antaŭ** la oka.*
- ***Post** la dek-unua horo ĉio devas esti preta.*
- *Strangaj aferoj komencas okazi **ĉirkaŭ** la dek-dua horo.*
- ***Ĝis** la dua horo kaj kvarono vi estos liberaj.*

Kiam temas pri horoj, oni ne uzu la rolmontrilon N, ĉar oni riskas konfuzi horon kun dato, kiu ankaŭ estas montrata per vicordaj nombrovortoj: *je la tria* = "je la tria horo", *la trian* = "en la tria tago de la monato".

## 23.9. Datoj

Por montri daton oni sekvu la jenajn modelojn. La vortoj *tago* kaj *de/en la jaro* estas tre ofte nur subkomprenataj:

- *Estis la tria (tago) de Decembro (de/en la jaro) mil naŭcent naŭdek unu.*
- *Hodiaŭ estas la dua (tago) de Majo (de/en la jaro) du mil kvin.*
- *Morgaŭ estos la dudek kvina (tago) de Julio (de/en la jaro) du mil dek.*

Por jaroj oni ankaŭ povas uzi vicordajn nombrovortojn: *Estis la lasta de Januaro (en/de la jaro) **1887-a (mil-okcent-okdek-sepa)***. Tia uzo estas nuntempe sufiĉe malofta, sed ĝi estis pli ofta en la fruaj jaroj de Esperanto, kaj iuj esperantistoj ĝin preferas ankoraŭ hodiaŭ. En la praktiko oni skribas jarojn preskaŭ ĉiam cifere: *(la jaro) **1975***, *(la jaro) **2000*** k.t.p. Tion faris ankaŭ Zamenhof. Tian ciferan jaroskribon oni povas tamen rigardi kiel skriban simpligon de A-finaĵa nombrovorto. Tiam oni legas *(la jaro) 1975* kiel *(la jaro) **mil-naŭcent-sepdek-kvina***. Povas esti, ke Zamenhof siatempe plej ofte uzis tian A-finaĵan elparolon, sed ni scias, ke li uzis ankaŭ la simplan elparolon sen A-finaĵo.

Inter la tago kaj la monato oni ĉiam uzu *de*, ĉar la vicorda nombrovorto ne rilatas al la monato, sed al la vorto *tago*, kiu normale estas forlasita: *la unua de Majo* = *la unua tago de Majo*, *la dek-tria de Decembro* = *la dek-tria tago de Decembro*. Se oni diras *la unua Majo*, oni parolas pri la unua el pluraj Maj-monatoj. Kiam oni skribe uzas ciferojn por la tago, oni ordinare skribas la A-finaĵon: *1-a de Majo*, sed iafoje oni uzas simpligitan skribon: *1 (de) Majo*. Tion oni tamen devas elparoli kiel *la unua (tago) de Majo*.

### Rolmontriloj de dato

Por montri la daton, kiam io okazis, okazas aŭ okazos, oni uzu taŭgan rolmontrilon. Ofte oni uzas la finaĵon N (§12.2.4):

- *Ili venos la sepa**n** (tago**n**) de Marto.* = *Ili venos **en** la sepa (tago) de Marto.*

- *La unua**n** de Majo ili komencis sian vojaĝon.* FA3.127 = ***En** la unua (tago) de Majo ...*
- *Mi laboris tie **ĝis** la unua de Aŭgusto mil naŭcent sesdek.*
- ***Antaŭ** la lasta tago de Junio vi devas trovi laboron.*
- ***Post** la dek kvina de Marto ŝi loĝos ĉe mi.*

## Skribo de dato

Kiam oni skribas daton, ekz. ĉe la komenco de letero, oni skribas kutime jene:

- *merkredon la 26-an de Novembro 1997*
- *vendredon la 9-an de Marto 2001*

Rimarku la N-finaĵojn ĉe la semajntago kaj la monatotago (§12.2.4).

Oni povas ankaŭ mallongigi tian datoskribon, ekz.: *26 Nov. 1997*, *9 Mar. 2001*. Oni prefere ne uzu ciferojn por monato, ĉar mallongigoj kiel *9.3.01* ne estas same komprenataj en ĉiuj landoj. Ĉu temas pri la 9-a de Marto aŭ pri la 3-a de Septembro? Principe estas rekomendinde uzi la internacian normon *ISO-8601*, ekz. *1997-11-26* (= *la 26-a de Novembro 1997*), *2021-09-03* (= *la 3-a de Septembro 2021*), sed en la praktiko ankaŭ tia skribado povas esti miskomprenata, ĉar ne ĉiuj bone konas tiun normon.

# 24. Kvantaj vortoj

Kvantaj vortoj iafoje kondutas en aparta maniero. Vortoj kun kvanta signifo povas esti O-vortoj (*multo*, *kelko* k.s.), A-vortoj (*multa*, *pluraj* k.s.), E-vortoj (*multe*, *kelke* k.s.), kaj E-vortecaj vortetoj (*pli*, *tiom* k.s.).

Kvantaj estas ankaŭ la nombraj vortetoj (§23).

## 24.1. Kvantaj O-vortoj

O-vorto, kiu esprimas kvanton, ofte estas priskribata de esprimo, kiu montras, el kio konsistas la kvanto, plej ofte kun la rolvorteto *da* (§12.3.3.1):

- *Kiam mi ien veturas, mi neniam prenas kun mi **multon** da pakaĵo.* [FE.35]

Sed iafoje oni uzas alian rolvorteton, precipe *de* aŭ *el* (§12.3.3.2): *Ne restas multo **de la pano**.*

Gramatike la kvanta O-vorto estas ĉefvorto, sed el senca vidpunkto la posta esprimo ofte estas pli grava. Tial oni iafoje traktas tiun kvazaŭ ĝi estus ĉefvorto:

- *Tiam grandega **multo** da vortoj* [...] *fariĝus en la skribado tute nediferencigeblaj unu de alia.* [FK.273] *Nediferencigeblaj* gramatike rilatas al *multo*, sed havas J-finaĵon, ĉar Zamenhof preferis trakti ĝin laŭ *vortoj*, al kiu ĝi sence rilatas. Fakte la frazo iĝus tre stranga, se oni dirus *nediferencigebla* sen J, ĉar la posta esprimo *unu de alia* trudas la ideon de pluraj individuoj.
- *Grandega **multo** da vortoj fariĝas tute senbezona por lernado.* [FK.285] Ĉi tie Zamenhof sekvis gramatikajn principojn, ĉar en tiu ĉi frazo temas pri unu senbezona amaso.
- *Post la kongreso **la plimulto** el la partoprenantoj estis kontentaj*. Oni povas ankaŭ diri *kontenta*.

Anstataŭ *multo*, *malmulto* kaj *kelko* oni plej ofte preferas la E-formojn *multe*, *malmulte* kaj *kelke* (§24.3).

Legu ankaŭ pri O-vortaj nombrovortoj kiel *duono* kaj *miliono* en §23.2.

## 24.2. Kvantaj A-vortoj

Kvantaj A-vortoj ofte kondutas kiel normalaj A-vortoj:

- ***Multaj** birdoj flugas en la aŭtuno en pli varmajn landojn.* [FE.32]
- *La ellernado kostis **multan** kaj grandan laboradon.* [FK.245]
- ***Kelkaj** homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj.* [FE.32]
- *Ŝi perdis nun unu el la plej utilaj komizoj de sia magazeno kaj troviĝas pro tio en **kelka** embaraso.* [M.77]
- *Vi faris bedaŭrinde **plurajn** erarojn.*

### O-vorteca uzo

La A-vortoj *multaj*, *malmultaj*, *kelkaj* kaj *pluraj* estas tre ofte uzataj kvazaŭ ili estus O-vortoj, O-vortece. Oni povas diri, ke O-vorto estas subkomprenata post la A-vorto. Kutime temas pri personoj, sed ne ĉiam. La kunteksto decidas:

- ***Multaj*** [legantoj] *kredeble balancas senkrede la kapon, legante miajn vortojn.* DL.6
- *Tro* ***malmultaj*** [homoj/aŭskultantoj] *venis al la prelego.*
- ***Kelkaj*** [personoj] *el ni tranoktis en la amasloĝejo.*
- ***Pluraj*** [homoj/aŭskultantoj/rigardantoj ...] *ne povis reteni sin, sed kuris sur la scenejon.*
- *Ili jam detruis tre* ***multajn*** [ilojn/objektojn ...].
- ***Kelkaj*** [fruktoj/pomoj ...] *estas preskaŭ tute maturaj.*

Kiel oni vidas, la subkomprenataj O-vortoj estas ofte tre ĝeneralaj. Ofte oni ne povas diri, kiu O-vorto estas subkomprenata, se oni ne konas la kuntekston. Iafoje preskaŭ ne estas eble enmeti O-vorton. Tiam la A-vorto plene alprenis O-vortan rolon. Tion oni povus nomi pronomeca uzo:

- ***Multaj*** *el niaj amikoj ne volas pacience atendi kaj labori.* OV.59 *Multaj* egalas principe al *multaj amikoj*, sed, se oni enmetas la vorton *amikoj*, la frazo fariĝas stranga.

Legu ankaŭ pri la diferenco inter *multe (da)* kaj *multaj*, *kelke (da)* kaj *kelkaj* en §24.3.

## 24.3. Kvantaj E-vortoj

E-vorto kun kvanta senco povas roli kiel ordinara E-vorto:

- *Mi* ***multe*** *dankas vin por via gastameco.* Rz.80
- *Ŝi etendis al la venintino la manon blankan, tre malgrasan, kun fingroj* ***multe*** *pikitaj de kudrilo.* M.106
- *La malfeliĉa knabino,* ***multe*** *kurinte kaj trovinte neniun, kiu volus ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro.* FE.23
- *Mi ne estas* ***multege*** *instruita lingvisto.* DL.10
- *Liaj okuloj* [...] *estis fiksitaj sur la vizaĝo de la juna vidvino, kiu eĉ plej* ***malmulte*** *ne atentis lian ĉeestadon.* M.59
- *Dio scias, ke mi estas* ***sufiĉe*** *rekompencita!* FA2.27

### O-vorteca uzo

Kvantaj E-vortoj tamen tre ofte aperas en frazo kvazaŭ ili estus O-vortoj, rolante kiel subjekto, objekto k.t.p. Praktike temas preskaŭ nur pri *multe*, *kelke*, *sufiĉe* kaj variantoj de tiuj vortoj:

- *Sur la arbo sin trovis* ***multe*** *(aŭ multo) da birdoj.* FE.32 *Multe* estas subjekto. La alternativo *multo* klare montras, ke *multe* ĉi tie kondutas kiel O-vorto.

- *El ŝia buŝo eliris* ***kelke*** *da perloj kaj* ***kelke*** *da diamantoj.* [FE.23] La du *kelke* estas subjektoj de *eliris*. Oni ankaŭ povas diri *kelko da perloj/diamantoj*, sed la O-formo *kelko* estas tre malofte uzata.
- *La riĉulo havas* ***multe*** *da mono.* [FE.37] *Multe* estas objekto, sed ĝi ne povas ricevi la finaĵon N, ĉar ĝi estas E-vorto.
- *Mi aĉetis por la infanoj tableton kaj* ***kelke*** *da seĝetoj.* [FE.38] *Kelke* rolas kiel objekto.
- *Kiam ŝi revenis, ŝi havis* ***multege*** *por rakonti.* [FA1.84] *Multege* rolas kiel objekto.
- *Mi havas* ***sufiĉe*** *da laboro en la preparado de mia ĉemizo de mortinto.* [FA2.96] *Sufiĉe* estas objekto.
- *Ĉiutage oni havis* ***sufiĉege*** *por manĝi.* [FA4.30] *Sufiĉege* (tre malofta vorto) estas objekto.
- *Post* ***kelke*** *da tagoj mi venos.* [M.29] *Kelke* estas tempa komplemento kun la rolvorteto *post*.
- ***Kelke*** *da minutoj la vidvino staris senmove.* [M.11] *Kelke* estas tempa komplemento. Tia komplemento havas normale ian rolmontrilon, ekz. N-finaĵon, sed E-vorto kiel *kelke* ne povas havi N-finaĵon. Estus tamen eble uzi ekz. la rolvorteton *dum* en tiaj ĉi okazoj: *Dum* ***kelke*** *da sekundoj en la ĉambro regis plena silento.* [M.25]
- *En rapideco ili preterpasis ŝin je* ***kelke*** *da paŝoj.* [M.202] *Kelke* estas *je*-komplemento.
- *Pri ili oni parolis kaj ankaŭ pri la* ***multe*** *da lupoj, kiuj antaŭe estis ĉi tie.* [FA4.169] *Ĉi tie* *multe* eĉ havas la artikolon *la*, kiu normale aperas nur ĉe O-vortoj. Tio estas tre malofta. Prefere oni uzu *la multo da lupoj*.

## Kio estas ĉefvorto?

Kvanta E-vorto tre ofte havas post si esprimon kun *da* aŭ alia rolvorteto (§12.3.3.2), kiu montras, kion la kvanto mezuras. Tiam povas ofte ŝajni, ke la E-vorto tute ne estas ĉefvorto, sed ke la ĉefvorto de la posta esprimo estas ĉefvorto. El senca vidpunkto tiu esprimo estas fakte pli grava, sed el gramatika vidpunkto la E-vorto ja estas ĉefvorto. Ĉi-poste sekvos tamen ekzemploj, en kiuj oni traktas la ĉefvorton de la posta esprimo kvazaŭ ĝi estus ĉefvorto.

## A-vorta priskribo de kvanta E-vorto

Kiam tia E-vorta frazeto havas A-vortan priskribon, oni normale rilatigas ĝin al la esprimo post la E-vorto:

- ***Multe*** *da preparoj estis* <u>*faritaj*</u>*.* [FA3.112] *Multe* estas ĉefvorto de la frazparto *multe da preparoj*. Gramatike do *faritaj* rilatas al *multe*, kaj devus teorie esti E-vorto: *farite*. Sed laŭsence ĝi rilatas al *preparoj*, kaj tial estas A-vorto.
- ***Multe*** *da larmoj estis* <u>*ploritaj*</u> *pri ĝi* [= la birdo]. [FA1.151]

- *Ili ellernis tiun ĉi lingvon en la daŭro de* <u>*iaj*</u> ***kelke*** *da semajnoj.* [FK.271] *Iaj* devus rilati al la ĉefvorto *kelke*, sed oni tamen rilatigas ĝin al *semajnoj*.
- ***Multe*** *da arto kaj penoj estis* <u>*eluzita*</u>*.* [FA2.105] *Eluzita* estas kompromisa formo, kiu havas A-finaĵon pro *arto kaj penoj*, sed kiu ne havas J-finaĵon pro *multe*, kiu estas iel unu-nombra, = *multo*. Tio estas iom tro stranga. Estas pli bone uzi J-finaĵon en *eluzitaj*, aŭ uzi *multo* anstataŭ *multe*.

Se tia kvanta E-vorto aperas sola, oni povas rilatigi eventualan priskribon nur al ĝi, kaj konsekvence oni devas uzi E-formon de la priskribo: ***Multe*** *estas* <u>*forgesite*</u>*.* [FA4.116] *Pri Kostromaj kaj Saratovaj* ***multe*** *estas* <u>*parolate*</u>*.* [Rz.11] (Kompreneble oni ankaŭ povas diri: *Multo estas forgesita. Multo estas parolata.*)

### Ĉu objekto aŭ komplemento?

Iafoje estas malfacile diri, ĉu *multe* estas objekto aŭ kvanta komplemento:

- *Ŝi* ***multe*** *pensis pri tio.* [FA1.33] *Multe* estas objekto aŭ kvanta komplemento de *pensis*. La signifo restas la sama.

### Kvantaj A-vortoj anstataŭ kvantaj E-vortoj

Ofte oni povas anstataŭigi kvantan E-vorton per kvanta A-vorto:

- *Sur la arbo sin trovis* ***multaj*** *birdoj. ≈ ... multe da birdoj.*
- *La riĉulo havas* ***multan*** *monon. ≈ ... multe da mono.*
- *Ŝi staris nur* ***kelkajn*** *sekundojn. ≈ ... kelke da sekundoj.*
- *Post* ***kelkaj*** *tagoj li venos. ≈ Post kelke da tagoj ...*

En tiaj frazoj la E-finaĵaj formoj *multe* kaj *kelke* ordinare esprimas la ideon de tuteca amaso. Oni ne atentas la individuajn membrojn. Se gravas ĉiu unuopa individuo, oni prefere ne uzu *multe* aŭ *kelke*. La A-vortaj formoj *multaj* kaj *kelkaj* estas tamen ĉiam uzeblaj, ĉu temas pri multaj/kelkaj individuoj, ĉu oni pensas pri kuna nedistingebla multo/kelko. La jena ekzemplo tial sonas strange: *****Kelke*** *da homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj.** Oni prefere diru: ***Kelkaj*** *homoj sentas sin la plej feliĉaj, kiam ili vidas la suferojn de siaj najbaroj.* [FE.32] Sentas ion nur ĉiu unuopa homo de tiuj kelkaj homoj. La tuto de la homoj ne havas sentojn.

> **Noto:** En la komencaj jaroj oni uzis *kelke* kaj *kelkaj* ankaŭ kun la senco "pluraj", ĉar tiutempe la vorto *pluraj* ankoraŭ ne ekzistis. Tia uzo de *kelke* kaj *kelkaj* nun tute malaperis.

## 24.4. Kvantaj vortetoj

E-vortecaj vortetoj kun kvanta signifo estas: *kiom*, *tiom*, *iom*, *ĉiom*, *neniom* (§14.3.3), *pli*, *plej* (§14.3.15), *tro* (§14.3.19) kaj variantoj de ili. Ili povas roli E-vortece en diversaj manieroj.

## O-vorteca uzo

Tre ofte kvantaj vortetoj estas uzataj O-vortece, simile kiel kvantaj E-vortoj (§24.3). Ili povas tiam esti subjekto, objekto k.t.p.:

- *Mi volus scii,* ***kiom*** *de la ŝtofo ili jam pretigis.* [FA1.108] *Kiom* estas objekto de *pretigis*.
- *Ĉu vi ne scias, Schufterle,* ***kiom*** *estis da mortigitoj?* [Rt.64] *Kiom* estas subjekto de *estis*.
- *Prenu* ***tiom*** *da mono,* ***kiom*** *vi volas.* [FA1.6] *Tiom* kaj *kiom* estas objektoj.
- *Pri* ***tiom*** *da feliĉo mi eĉ ne sonĝis, kiam mi estis ankoraŭ la malbela anasido!* [FA2.42] *Tiom* estas *pri*-komplemento.
- *Oni alportos* ***iom*** *da akvo.* [Gn.18] *Iom* estas objekto.
- *Adamo Rudzinski rigardis ŝin kun granda intereso, eĉ kun* ***iom*** *da admiro.* [M.76] *Iom* estas *kun*-komplemento.
- *Restas ankoraŭ* ***iom*** *da problemoj. Iom* estas subjekto.
- *Pro Dio, sinjoroj, pli rapide faru rondon kaj observu* ***pli*** *da ordo!* [Rz.55] *Pli* estas objekto.
- ***Pli*** *li ne povas diri al ili pri tio, ĉar* ***pli*** *li ne scias.* [FA3.117] *Pli* estas objekto.
- *Vi informiĝas,* [...] *kiu montras al ili* ***plej*** *da respekto.* [Rt.56] *Plej (da respekto)* estas objekto.
- ***Tro*** *da kuiristoj kaĉon difektas.* [PE.433] *Tro* estas subjekto.
- *De* ***tro*** *da pano venas malsano.* [PE.296] *Tro* estas *de*-komplemento.
- ***Pli*** *estis alportite. Pli* estas subjekto. La perverba priskribo havas E-finaĵon, ĉar la subjekto estas E-vorteca vorteto.

### A-vorta priskribo de kvanta vorteto

Simile kiel ĉe kvantaj E-vortoj oni iafoje rilatigas priskribon al la posta esprimo, kvankam ĝi ne estas gramatika ĉefvorto:

- *Ŝi apartenas al homoj kleraj, por kiuj* ***tiom, tiom*** *da vojoj estas ja <u>nebaritaj</u>.* [M.118] Laŭ rigora gramatiko devus esti *nebarite*, ĉar el gramatika vidpunkto *nebaritaj* priskribas la vorton *tiom*. Tamen oni uzas *nebaritaj*, ĉar laŭsence ĝi priskribas la vorton *vojoj*.
- ***Pli*** *da manĝaĵoj estis <u>alportitaj</u>.*

### Malnova A-vorteca uzo de OM-vortoj

En la frua tempo oni iafoje uzis *kiom* kaj *tiom* A-vortece kiel rektan priskribon de O-vorto: *Se l' amikoj* [...] *kolektos* ***tiom voĉojn****, kiom ili povos* [...] [DL.13] En ordinara lingvaĵo oni nun devas uzi *da*: ... *tiom da voĉoj* ... En ekz. poezio oni eble ankoraŭ povas uzi tiajn esprimojn por speciala efekto. Komparu kun simila malnova uzo de O-vortaj nombrovortoj (§23.2).

## 24.5. Grado kaj kvanto

Grado kaj kvanto estas malsamaj aferoj, sed iafoje ili proksimiĝas.

### *Tre* kaj *multe*

- *tre* = “en alta grado, kun forta intenso”
- *multe* = “en granda kvanto, kun longa daŭro, ofte ripetite”

Ĉe A-vortoj kaj E-vortoj oni preskaŭ ĉiam uzas *tre* (§14.3.18), sed oni povas uzi *multe* (§24.3), kiam klare temas pri kvanto aŭ ofteco. Ĉe verboj oni uzas plej ofte *multe*, ĉar temas normale pri kvanto aŭ ofteco, sed oni uzas ankaŭ *tre*, kiam temas pri grado aŭ intenseco:

- *Ĝi estas **tre** bona.*
- *Tie troviĝas **tre** grandaj domoj.*
- *Mi **tre** ŝatas Berlinon. = Mi intense ŝatas Berlinon.*
- *Mi **tre** amas ŝin. = Mi intense amas ŝin.*
- *Mi havas **multe** da mono.*
- *Ŝi **multe** pensis pri tio. = Ŝi longe pensis pri tio.*
- *Kiu **multe** parolas, ne **multe** faras.* [PE.544]
- *Li **tre** **multe** helpis al mi. Tre* priskribas *multe*. *Multe* priskribas *helpis*.

Por priskribi *pli* kaj *tro* oni uzas *multe*:

- *Ĝi estis **multe** pli granda ol antaŭe.*
- *Ĝi fariĝis **multe** tro nigra.*

### *Kiel* kaj *tiel*

La tabelvortoj *kiel* kaj *tiel* (§14.3.2) montras ne nur manieron, sed ankaŭ gradon. Oni uzu ilin en la samaj lokoj, kie oni povus uzi *tre*:

- *Vi estas **tiel** bela, **tiel** bona kaj **tiel** honesta, ke mi devas fari al vi donacon.* [FE.15] Oni povas diri: *tre bela*, *tre bona* kaj *tre honesta*.
- *Mi estas **tiel** forta, kiel vi.* [FE.10] Oni povas diri: *tre forta*.
- *Fi, **kiel** abomene!* [FE.26] Oni povas diri: *tre abomene*.
- *Estas bone uzadi la vorton “je” **kiel** eble pli malofte.* [FE.29] Oni povas diri: *tre eble*. (Nuntempe oni ordinare uzas *kiel eble plej* §14.3.15 anstataŭ *kiel eble pli*.)
- *La nokto estis **tiel** malluma, ke ni nenion povis vidi eĉ antaŭ nia nazo.* [FE.33] Oni povas diri: *tre malluma*.

### *Kiom* kaj *tiom*

La tabelvortoj *kiom* kaj *tiom* (§14.3.3) montras kvanton. Oni uzu ilin tie, kie oni povus uzi *multe*:

- *Mi volas **tiom** da terpomoj, **kiom** mi povas porti*. Oni povas diri: *volas multe* kaj *povas porti multe*.

- *Ŝi **tiom** <u>laboris</u>, ke ŝi fariĝis ĉefo de la firmao.* Oni povas diri: *multe laboris*.

Antaŭ *multe* oni ofte preferas *tiom*, ĉar *multe* estas kvanta vorto: *Nun li estis ja riĉa, havante **tiom** <u>multe</u> da mono.* [FA1.8] Aŭ *... havante tiel multe da mono.* Aŭ *... havante tiom da mono.*

### "*Tiom-kiom*-ismo"

*Kiom* kaj *tiom* estas iafoje uzataj pri grado anstataŭ *kiel* kaj *tiel* (§14.3.3), kiam oni volas tre forte emfazi. Sed iuj esperantistoj uzas sisteme nur *kiom* kaj *tiom* anstataŭ *kiel* kaj *tiel* por montri gradon, kvazaŭ ili ĉiam emfazus, ekz.: **Mi estas **tiom** forta, **kiom** vi.** Komparu kun la Fundamenta frazo: *Mi estas **tiel** forta, **kiel** vi.* [FE.10] Tia "*tiom-kiom*-ismo" estas komplete fremda al la *Fundamento* kaj al la uzado de Zamenhof. Krome *tiom-kiom*-istoj perdas la eblon uzi *tiom* kaj *kiom* por emfazi.

# 25. Specialaj priskriboj

En tiu ĉi paragrafo estas klarigoj de tri specialaj specoj de priskribo: perverba priskribo (§25.1), identiga priskribo (§25.2) kaj apudmeto (§25.3).

## 25.1. Perverba priskribo

Normalaj priskriboj estas rektaj (§3.3). Rekta priskribo estas parto de la sama frazparto kiel la priskribata ĉefvorto. Sed priskribo ankaŭ povas esti ligata al la priskribata afero **pere de verbo**.

Perverbe priskribata afero estas normale la subjekto (§12.1.1) de la frazo, sed ankaŭ objekto (§12.2.2) povas havi perverban priskribon.

Perverba priskribo ne havas la rolfinaĵon N, kaj nur en kelkaj okazoj aperas rolvorteto antaŭ perverba priskribo.

### 25.1.1. Perverba priskribo de subjekto

La verbon *esti* (§31.1) kaj aliajn priskribajn verbojn, ekz. *fariĝi*, *iĝi* kaj *ŝajni*, oni povas uzi por ligi priskribon al subjekto.

#### A-vorto aŭ A-vorteca vorteto

Perverba priskribo de subjekto estas plej ofte A-vorto aŭ A-vorteca vorteto:

- *La patro estas **sana**.* [FE.5] *Sana* estas priskribo de *la patro*.
- *La ĉielo estas **blua**.* [FE.6] *Blua* estas priskribo de *la ĉielo*.
- *La dentoj de leono estas **akraj**.* [FE.7] *Akraj* estas priskribo de *la dentoj*.
- *Ĉiuj boteloj estis **malplenaj**.* *Malplenaj* estas priskribo de *ĉiuj boteloj*.
- *Vi tute ne estas **ĝentila**.* [FE.19] *Ĝentila* estas priskribo de *vi*.
- *Sinjoroj, vi estas **neĝentilaj**.* [FE.16] *Neĝentilaj* estas priskribo de *vi*.
- *Jam **tia** estas la kutimo.* [M.59] *Tia* estas priskribo de *la kutimo*.
- ***Kia** estas via peto?* [Es.5] *Kia* estas (demanda) priskribo de *via peto*.
- *Ŝi fariĝis tiel **malaminda**, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de si.* [FE.23] *Malaminda* estas priskribo de *ŝi*.

Tiaj A-vortaj priskriboj povas havi J-finaĵon (§8.1), sed ili neniam havu rolvorteton (§12.3) aŭ N-finaĵon (§12.2.1).

#### O-vorta frazparto sen rolmontrilo

Perverba priskribo povas ankaŭ esti O-vorto aŭ O-vorta frazparto sen rolmontrilo. Tia perverba priskribo montras specon aŭ identecon:

- *Leono estas **besto**.* [FE.5] *Besto* estas (speca) priskribo de *leono*.
- *Rozo estas **floro** kaj kolombo estas **birdo**.* [FE.5]
- *La patro estas **tajloro**.* [FE.5]
- *Centimo, pfenigo kaj kopeko estas **moneroj**.* [FE.41]
- *Li estas **knabo**, kaj ŝi estas **knabino**.* [FE.16]
- *Ni estas **homoj**.* [FE.16]

- *<u>Infano</u> ne estas **matura homo**.* [FE.6]
- *<u>Januaro</u> estas **la unua monato de la jaro**.* [FE.12]
- *<u>Ok</u> estas **kvar kvinonoj de dek**.* [FE.14]
- *<u>Tio ĉi</u> estis **la unua fojo, ke ŝi nomis ŝin sia filino**.* [FE.14]
- *<u>La juna vidvino</u> fariĝis denove **fianĉino**.* [FE.33]

Ankaŭ tabelvortoj je O povas aperi kiel tia priskribo:

- *<u>La tuta afero</u> estis **nenio** krom sensencaĵo!* [FA1.140]
- *Mi scias, **kio** <u>mi</u> estas.* [FA2.84]

## O-vorta frazparto kun rolvorteto

Perverba priskribo de subjekto povas ankaŭ esti O-vorto (aŭ O-vorta frazparto) kun rolvorteto antaŭ si. Tia priskribo montras econ. Oni povas ofte transformi tian priskribon en A-vorton:

- *<u>Li</u> estas hodiaŭ **en kolera humoro**.* [FE.31] *= Li estas hodiaŭ kolerhumora.*
- *<u>Li</u> estas **de meza kresko**.* [FE.33] *= ... mezkreska.*
- *<u>Ĝi</u> estos **de alia speco** ol la hieraŭa.* [FA2.8] *= ... alispeca ...*
- *Eĉ <u>malgranda muŝo</u> ne estas **sen buŝo**.* [PE.1019] *= ... senbuŝa.*
- *<u>Tiuj bulkoj</u> eĉ estis **kun sekvinberoj**.* [FA1.79] *= ... sekvinberaj.*
- *<u>Tio</u> ĉi estas **laŭ lia gusto**.* [PE.826] *= ... konforma al lia gusto.*
- *Laŭ mi <u>tiu ĉi demando</u> estas por la publiko **sen signifo**.* [DL.10] *= ... sensignifa.*

## Esprimo kun *kiel* aŭ *kvazaŭ*

Ankaŭ kompara esprimo kun *kiel* (§20.1) aŭ *kvazaŭ* (§20.2) povas roli kiel perverba priskribo de subjekto:

- *Sen li <u>mi</u> estas **kiel paralizita**.* [BV.84]
- *<u>Liaj manoj</u> estas **kiel alabastro**.* [Rn.35] *= ... estas tiaj, kia estas alabastro.*
- *<u>Tio</u> estis ja tute **kiel ĉe homoj**.* [FA3.19]
- *<u>Leŭtenanto, amo kaj mizero</u> estas **kvazaŭ triangulo**, aŭ **kvazaŭ duono de rompita ĵetkubo de la feliĉo**.* [FA1.125]

## E-vorto

Oni uzas E-vorton kiel perverban priskribon anstataŭ A-vorto, se la priskribata subjekto estas I-verbo (§27.2) aŭ subfrazo (§33.2.1):

- *<u>Resti</u> kun leono estas **danĝere**.* [FE.7]
- *<u>Morti</u> pro la patrujo estas **agrable**.* [FE.20]
- *Al Amnon ŝajnis **malfacile** <u>fari</u> ion al ŝi.* [Sm2.13]
- *Kiel **belege** estas, <u>ke ni povas entrepreni vojaĝon eksterlanden</u>!* [FA4.27]
- *Estas pli **bone** <u>ke ni tie ĉi manĝu kaj iru en la urbon vespere</u>.* [BV.84]
- *Ne estas **grave**, <u>ĉu vi lin konas aŭ ne</u>.* [FA3.114]

- *Al li fariĝis **dube**, ĉu la fera stango estas ŝovita antaŭ la pordon kaj ĉu la fenestraj kovriloj estas bone alfortikigitaj.* FA3.140
- *Estas **mirinde**, kiajn pensajn saltojn oni povas fari.* FA2.118

Iafoje E-vorto priskribas subkomprenatan I-verbon:

- *Li veturas pli rapide ol **permesite**.* La E-vorto *permesite* priskribas la verbon *veturi*: *... pli rapide ol estas **permesite** veturi*.

Oni uzas E-vorton anstataŭ A-vorto ankaŭ kiam ne ekzistas subjekto. Tiam la perverba priskribo priskribas la tutan situacion:

- *Estis al mi tiel **terure**, kiam vi ĵetis min de la ponto en la malvarman akvon!* FA1.24 *Estis terure* estas ĝenerala priskribo de la situacio. Subjekto mankas.
- *Estas **troe**, ho Levidoj!* Nm.16
- *Estos **sufiĉe**, se ni diros al vi la jenon.* FK.284
- *Ĉu hodiaŭ estas **varme** aŭ **malvarme**?* FE.25

En la parola lingvo oni sufiĉe ofte uzas mallongigitajn sensubjektajn frazojn, en kiuj oni ellasas ĉion krom E-vorto, kiu estas priskribo de la aktuala situacio:

- ***Bone**! **Tre bone**!* H.41 *= Estas bone! Estas tre bone!* (*= Tio, kion vi diris, estas bona!*)
- ***Mirinde**!* FA2.139 *= Estas mirinde!* (*= La situacio estas mirinda! Tio, kio ĵus okazis, estas mirinda!*)

Ofte E-finaĵa pasiva participo estas uzata en pli-malpli ekkriaj esprimoj kiel priskribo de okazaĵo:

- ***Trafite**! Kion diras vi? – **Tuŝite**! **Tuŝite**, mi konfesas.* H.169 *≈ La celo estas trafita/tuŝita!* (Temas pri skermado.)
- *Ĉu **komprenite**? ≈ Ĉu ĉio estas komprenita? Ĉu vi komprenis la aferon?*

Se la subjekto estas subkomprenata O-vorto aŭ O-vorteca vorteto, oni tamen uzu A-finaĵon: *La mastro traktis min tre bone, kaj estis tre **afabla**. = ... kaj li estis tre **afabla**. Estu **kuraĝa**! = Vi estu **kuraĝa**!*

## Frazo aŭ I-verbo

Perverba priskribo povas ankaŭ esti tuta frazo aŭ I-verbo:

- *La esenco* [de la sciigoj] *estis, **ke al Kristino estas bone**.* FA3.91 La *ke*-frazo estas perverba priskribo de la subjekto.
- *Mia opinio estas: **prenu mem akvon, se vi volas trinki**.* FE.19
- *Mia devo estas **helpi la traveturantojn**.* Rz.31

Vidu pliajn ekzemplojn en la klarigoj pri I-verboj: §27.3.3.

## Priskribaj verboj

Verbon, kiu peras priskribon, oni povas nomi **priskriba verbo**. *Esti* (§31.1) estas la ĉefa priskriba verbo. Kiam ĝi peras priskribon, ĝi ne vere esprimas ian signifon, sed nur ligas la priskribon al la subjekto.

Aliaj priskribaj verboj enhavas pli da propra signifo:

- *fariĝi* (= "komenci esti"): *La domo fariĝis* ***alta****. Mia frato fariĝos* ***doktoro****. Fariĝis* ***tre varme*** *en la ĉambro.*
- *iĝi* (= "komenci esti"): *La mistero iĝas* ***pli kaj pli stranga****.*
- *resti* (= "plu esti"): *Ili restis* ***germanoj****. Restis* ***malhele****.*
- *ŝajni* (= "esti laŭŝajne"): *Li ŝajnis* ***gasto*** *en la hotelo.*
- *aperi*: *Li aperis* ***mensoganto****.*
- *aspekti* (= "esti laŭ la aspekto"): *Ŝi aspektis* ***kolera****.* [FA1.195] *= Ŝia aspekto montris, ke ŝi estas kolera.*

Kun *aspekti* oni tamen tre ofte uzas E-vortan (aŭ E-vortecan) komplementon anstataŭ perverba priskribo: *La diablo aspektas* ***malbele****.* [FA1.17] *En la novaj vestoj ŝi aspektis tiel* ***elegante*** *kaj* ***bele****.* [FA3.46] Perverba priskribo (kun A-vorto) kaj maniera komplemento (kun E-vorto), estas egale ĝustaj ĉe *aspekti*, kaj tre ofte apenaŭ gravas, kiun formon oni elektas. Sed iafoje povas esti senca diferenco. Se oni uzas A-vorton, oni parolas pri eco de la subjekto: *La domo aspektas* ***bona****. = La aspekto de la domo montras, ke ĝi (verŝajne) estas bona.* Se oni uzas E-vorton, oni parolas pri la aspekto mem: *La domo aspektas* ***bone****. = La aspekto de la domo estas bona.* Komparu kun tute simila uzo de *senti sin* (§25.1.2). Se temas pri participo, oni uzu A-finaĵon: *Ŝi aspektis* ***dormanta****.* Se oni uzas E-finaĵon (*dormante*), tio povas miskompreniĝi kiel: *Ŝi aspektis dum ŝi dormis.* Vidu la klarigojn pri participoj kiel E-vortoj: §28.2. Principe oni povas uzi *kia* kun *aspekti*, sed normale oni uzas *kiel*: ***Kiel*** *do li aspektas?* [FA1.17] *Ĉiu Kopenhagano scias,* ***kiel*** *aspektas la enirejo de la Frederika hospitalo.* [FA1.128]

Krom *fariĝi* kaj *iĝi* ankaŭ multaj aliaj IĜ-verboj povas aperi kun perverba priskribo de la subjekto:

- *montriĝi*: *Mi scias, ke mi montriĝos* ***prava****.* [Ij.13]
- *nomiĝi*: *La hundo nomiĝas* ***Fido****.*
- *elektiĝi*: *Li elektiĝis* ***kasisto****.*

La samaj verboj sen IĜ-sufikso (*montri*, *nomi*, *elekti*...) normale estas objektaj verboj (§30.3), kaj povas esti uzataj kun perverba priskribo de la objekto (§25.1.2):

- *Mia opinio sin montris* ***favora****.* [BV.14] *→ Mia opinio montriĝis* ***favora****.*
- *Mi nomas mian hundon* ***Fido****. → Mia hundo nomiĝas* ***Fido****.*
- *Liaj amikoj elektis lin* ***gvidanto****. → Li elektiĝis* ***gvidanto****.*

## Pasivaj verboj povas peri priskribon

Se oni pasivigas (§29.1) frazon kun perverba priskribo de objekto (§25.1.2), la objekto fariĝas subjekto, kaj la perverba priskribo priskribas la novan subjekton. Tiam pasiva verboformo peras la priskribon:

- *Oni elektis ŝin* ***prezidanto****. → Ŝi estis elektita* ***prezidanto****.*
- *Ankaŭ ŝin oni nomas* ***Amalio****. → Ankaŭ ŝi estas nomata* ***Amalio****.* [Rt.106]
- *Oni esploris la aferon kaj trovis ĝin* ***vera****. → La afero estis esplorita kaj trovita* ***vera****.* [Es.2]

Tiaj frazoj povas fariĝi konfuzaj, ĉar pasiva verbo enhavas participon (*elektita*, *nomata*, *trovita*), kiu jam estas perverba priskribo de la subjekto. En *ŝi estis* ***elektita prezidanto***, kaj *elektita*, kaj *prezidanto*, estas perverbaj priskriboj de *ŝi*. Krome oni povus kompreni *elektita prezidanto* kiel unu frazparton, kio donus alian signifon: *Ŝi estis* ***prezidanto, kiun oni antaŭe elektis***. Ofte estas pli klare, se oni anstataŭe uzas *kiel*-esprimon (§20.1): *Ŝi estis elektita* ***kiel prezidanto***.

## Agaj verboj

Perverbaj priskriboj povas iafoje aperi kun agaj verboj, kiuj ne estas priskribaj. Tiaj frazoj estas laŭsence kunmetaĵo de du frazoj. Unu el tiuj frazoj enhavas la verbon *esti*:

- *Li dancas* ***nuda*** *sur la strando. = Li dancas sur la strando. + Li estas* ***nuda****, kiam li dancas.*
- ***Malvarma*** *kaj* ***pala*** *kuŝis la imperiestro en sia granda belega lito.* [FA2.30] *= La imperiestro estis* ***malvarma*** *kaj* ***pala****. + La imperiestro kuŝis ...*
- *Mi frapos vian ĉevalon sur la kapon tiel, ke ĝi falos* ***senviva****.* [FA1.14] *= ... ĝi falos kaj ĝi estos* ***senviva****.*
- *Mia patro mortis* ***malriĉa****. = Mia patro estis* ***malriĉa****, kiam li mortis.*
- *Mi naskiĝis* ***mizerulo****. = Mi estis* ***mizerulo****, kiam mi naskiĝis.*
- *Ŝi naskiĝis* ***kristano****, sed mortis* ***islamano****. = Ŝi estis* ***kristano****, kiam ŝi naskiĝis, sed estis* ***islamano****, kiam ŝi mortis.*
- *Nun ĉiuj floroj pendas* ***sekiĝintaj****!* [FA1.29] *= La floroj estas* ***sekiĝintaj****, kiam ili pendas.*
- *Ili sidis ne* ***solaj****, sed kun unu viro de ĉirkaŭ tridek jaroj.* [BV.36] *= Ili sidis, kaj ili ne estis* ***solaj*** *...*

Iafoje oni povus same bone uzi E-formon anstataŭ A-formo en tiaj frazoj, sed ofte estas signifodiferenco, ĉar A-formo montras priskribon de la subjekto, dum E-formo priskribas la agon:

- *Li venis* ***unua*** *en la ĉambron. = Li venis en la ĉambron, kaj li estis la unua, kiu faris tion.*
- *Li venis* ***unue*** *en la ĉambron. = La unua afero, kiun li faris, estis veni en la ĉambron (poste li faris ion alian).*

Zamenhof uzis *tuta* kiel perverban priskribon kun speciala signifo: *De teruro mi **tuta** tremas!* [H.45] *Ĝi estas **tuta** el ligno.* [FA3.81] *Tuta* montras, ke la tuta subjekto estas koncernata de la ago. Tia uzo de *tuta* estas nuntempe malofta.

### 25.1.2. Perverba priskribo de objekto

Kelkaj verboj povas peri priskribon de sia objekto. Kvankam tiaj perverbaj priskriboj priskribas objekton, ili ne havu la finaĵon N.

Komparu la du jenajn frazojn:

- *Vi farbas <u>la domon</u> **ruĝan**.* (= *Vi farbas la ruĝan domon.*) *Ruĝan* estas ĉi tie **rekta priskribo** de *la domon*. = *Vi farbas tiun domon, kiu jam estas ruĝa.* Oni ne diras, kiun koloron ĝi nun ricevas.
- *Vi farbas <u>la domon</u> **ruĝa**. = Vi farbas la domon tiel, ke ĝi fariĝas ruĝa. Ruĝa* estas **perverba priskribo** de *la domo*. La ruĝeco aperas pro la ago *farbi*. Oni ne diras, kiun koloron la domo antaŭe havis. (Oni povas ankaŭ diri: *Vi farbas **ruĝa** <u>la domon</u>.* Sed ne diru: **Vi farbas la **ruĝa** domon.**)

#### A-vorto aŭ A-vorteca vorteto

Perverba priskribo de objekto povas esti A-vorto aŭ A-vorteca vorteto:

- *Ĉu vi farbos <u>vian ruĝan domon</u> **verda**? ≈ Ĉu via ruĝa domo fariĝos verda?*
- *Ne, ni preferas <u>ĝin</u> **flava**. = Ne, ni preferas, ke ĝi estu flava.*
- *Ŝi trovis <u>la francajn vinojn</u> tre **bonaj**. = Ŝi trovis, ke ili estas tre bonaj.*
- *Neniam mi vidis <u>lin</u> **tia**.* [Rt.82] *= Neniam mi vidis, ke li estas tia.*
- *Li sentis <u>sin</u> tiel **malfeliĉa**, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita.* [FE.33] *= Li sentis, ke li estas tiel malfeliĉa ...*

La esprimo *senti sin* povas havi perverban priskribon de la objekto: *Li sentis <u>sin</u> **malsana**. = Li sentis, ke li estas malsana.* Sed oni ankaŭ povas uzi E-vorton, kiu tiam estas maniera komplemento de la verbo: *Li <u>sentis</u> sin **bone**. = Lia sento (pri si mem) estis bona.* La elekto de finaĵo do dependas de tio, ĉu oni parolas pri eco de la objekto (ĉi-okaze egala al la subjekto), aŭ pri la sento mem. Komparu kun tute simila uzo de *aspekti* (§25.1.1).

#### Eble tamen N-finaĵo

Iafoje ĉi tia A-finaĵa priskribo de objekto sence respondas al *kiam*-frazo, kaj montras staton, kiu ne dependas de la ĉefverba ago. En tiaj okazoj oni povas opinii, ke temas ne pri vera perverba priskribo, sed pri iaspeca komplemento. Tiam oni povas ja uzi N-finaĵon. Tia aldono de N povas iafoje doni nuancan diferencon:

- *Ni <u>lin</u> trovis **malvivan**.* [Rt.138] *= Ni lin trovis, kiam li estis malviva.* La N de *malvivan* povas helpi al klareco, sed oni ankaŭ povas ĝin forlasi. Sen N-finaĵo la signifo ankaŭ povas esti: *Ni lin trovis, kaj trovis, ke li estas malviva.*
- *Li pentras <u>ŝin</u> **nudan**. = Li pentras ŝin, kiam ŝi estas nuda.* Se oni dirus *nuda* sen N, la signifo estus: *Li pentras bildon, en kiu ŝi estas nuda.* Sen

N la signifo eĉ povas esti: *Li pentras ŝin, kiam li mem estas nuda.* Sed por tia signifo estas pli klare diri: *Li nuda pentras ŝin.*

- *Ĉi tiun vorton li uzas* ***solan***. Li uzas tiun vorton sen aliaj vortoj. (*Ĉi tiun vorton li uzas* ***sola***. Nur li uzas tiun vorton.)
- *Ofte en vespero ŝi vidadis lin* ***forveturantan*** *sub la sonoj de muziko.* [FA1.91] Ŝi vidadis lin, kiam li estis forveturanta.
- *Mi ŝatas la matenmanĝajn ovojn* ***malmolaj(n)***. = *Mi ŝatas la matenmanĝajn ovojn, kiam ili estas malmolaj. Mi ŝatas, ke la matenmanĝaj ovoj estu malmolaj.* Iuj uzas N en tiaj ĉi frazoj. Aliaj preferas A-vorton sen N. La signifodiferenco praktike estas nula.

La uzo de N-finaĵo en tiaj ĉi okazoj neniam estas deviga. Neuzo de N estas verŝajne pli ofta nuntempe, sed kiam aldono de N donas plian klarecon, oni ne hezitu esprimi sin tiel. Sed kiam la ligo al la ĉefverbo estas forta, kaj la A-vorto ne respondas al *kiam*-frazo, sed al *ke*-frazo, tiam oni nepre ne uzu N-finaĵon.

### O-vorta frazparto sen rolmontrilo

Perverba priskribo de objekto povas esti O-vorto (aŭ O-vorta frazparto) sen rolmontrilo:

- *Mi elektis lin* ***prezidanto***. [LR.78] = *Mi elektis lin, ke li estu prezidanto.*
- *Jam en ilia infaneco oni ja nomadis ilin* ***gefianĉoj***. [FA3.91] ≈ *... oni diris, ke ili estas gefianĉoj.*
- *Vin mi volas* ***fari*** *mia edzo!* [FA3.98] = *Mi volas fari tiel, ke vi estos mia edzo.*

Ĉe iaj verboj oni povas alternative uzi *kiel*-esprimon (§20.1.2). Tiam oni ja uzu N-finaĵon: *Ili elektis ŝin kiel kasisto**n**.*

### O-vorta frazparto kun rolvorteto

Iafoje frazparto kun rolvorteto povas esti perverba priskribo de objekto:

- *Kristino al li plaĉis kaj ŝi lin ankaŭ trovas* ***laŭ sia gusto***. [FA3.91] = *... ŝi trovas, ke li estas laŭ ŝia gusto.*
- *Mi preferas ĝin* ***sen sukero***. = *Mi preferas, ke ĝi estu sen sukero.*

### E-vorto

Se la objekto estas I-verbo, oni uzas E-vorton kiel perverban priskribon de la objekto anstataŭ A-vorto. Tio praktike okazas preskaŭ nur kun verboj, kiuj esprimas opinion, ke io estas ia, precipe *opinii* kaj *trovi*:

- *Nek Snitchey nek Craggs trovis* ***utile*** *batali malkaŝe kontraŭ la fluo de tiu ĉi kolero.* [BV.70] = *Ili ne opiniis, ke batali malkaŝe kontraŭ la fluo estas utile.* Objekto de la verbo *trovi* estas la I-verbo *batali (malkaŝe kontraŭ ...)*. *Utile* estas perverba priskribo de *batali*. La priskribon peras la ĉefverbo *trovis*.
- *Tiun ĉi penson* [...] *ni trovis nun* ***necese*** *ripeti ankoraŭ unu fojon.* [OV.106] = *Ni trovis nun necese ripeti tiun ĉi penson ankoraŭ unu fojon. Necese* estas perverba priskribo de *ripeti (tiun ĉi penson ...)*.

- *Dank' al* [...] *kelkaj flankoj de la lingvo, pri kiuj mi trovas* ***superflue*** *tie ĉi detale* *paroli, la lingvo fariĝas eksterordinare facila.* FK.233 *Superflue* estas perverba priskribo de *paroli*.
- *Tiu homo iris el la urbo, el Bet-Leĥem de Jehuda, por elekti tie, kie li trovos* ***oportune*** [ekloĝi]. Jĝ.17

Ankaŭ kiam la objekto estas subfrazo, oni uzu E-vorton kiel perverban priskribon. Tio tamen okazas tre malofte:

- *Mi trovas* ***neelteneble***, *ke vi ne volas paroli kun mi*. (= *Mi pensas, ke estas neelteneble, ke vi ne volas paroli kun mi.*) La *ke*-frazo estas objekto de *trovas*. *Neelteneble* estas perverba priskribo de la *ke*-frazo.
- *Kial oni ĉe vi opinias* ***nekredinde***, *ke Dio levos la mortintojn?*
- *Mi opinias* ***grave***, *ĉu ŝi subtenos nin aŭ ne*. (= *Mi opinias, ke estas grave, ĉu ŝi* ...) La demanda *ĉu*-frazo estas objekto de *opinias*. *Grave* estas perverba priskribo de la *ĉu*-frazo.

Zamenhof ofte enmetis *ĝi* aŭ *tio* por reprezenti *ke*-frazon, kaj iafoje por reprezenti I-verbon. Tiam la perverba priskribo havu A-finaĵon, ĉar *ĝi* kaj *tio* estas O-vortecaj vortetoj:

- *Ĉu vi, kara Mario, trovas ĝin* ***konvena***, *ke juna virino* [...] *restu la tutan tagon ĉe la sama tablo kun kelke da junaj viroj?* M.88 *Konvena* estas perverba priskribo de *ĝin*, sed ankaŭ (nerekte) de la *ke*-frazo. Nuntempe oni preferas *tio* kiel helpan vorteton: *Ĉu vi trovas tion* ***konvena***, *ke ...*
- *Se la Akademio trovus ĝin* ***necesa*** *anstataŭigi en ili la "uj" per "i", mi tion ne malkonsilus.* LR.18B Hodiaŭ oni ne plu uzas *ĝi* tiel. Oni diru *... trovus tion necesa ...* aŭ prefere *... trovus necese ...*

Iafoje en tiaj ĉi frazoj povus fariĝi malklare, ĉu la E-vorto estas perverba priskribo aŭ maniera komplemento: *Li opiniis* ***eble***, *ke oni maldungu la komizojn*. Oni povus miskompreni *eble* kiel komplementon = *Povas esti, ke li opiniis, ke oni ...* Tiam oni uzu helpan *tio* aŭ pli klaran vortordon: *Li opiniis tion* ***ebla***, *ke oni ... Li* ***eble*** *opiniis, ke oni ...*

Laŭ *PAG* oni uzu A-vorton anstataŭ E-vorto kiel perverban priskribon de objekto, kiam la objekto estas I-verbo aŭ subfrazo: *Mi opinias* ***konvena*** *vigligi vin per rememorigo.* Tio tamen ne ŝajnas rekomendinda, ĉar tio rompas la bazan principon, ke I-verboj kaj subfrazoj estas priskribataj per E-vortoj. Sed oni povas trovi plurajn ekzemplojn de tia uzo ĉe Zamenhof, kiu hezitis inter A-finaĵo kaj E-finaĵo en tiaj frazoj: *La gazetoj ne trovas* ***necesa*** *eniĝi en tion, pri kio ili skribas.* FK.283 *Ĉar li estis en uniformo, li opiniis* ***nekonvena*** *tiel laŭte krii.* FA1.155

En 2012 la Sekcio pri Gramatiko de la Akademio de Esperanto publikigis dokumenton, *Oficialaj Informoj Numero 19 - 2012 07 13*, en kiu ĝi diris, ke ambaŭ uzoj estas pravigeblaj. Ĝi tamen rekomendis al verkistoj de lernolibroj, ke oni uzu E-finaĵon ĉe perverba priskribo de objekto, kiu mem estas I-verbo aŭ subfrazo. La ĉi-antaŭaj *PMEG*-aj klarigoj estas konformaj al tiu rekomendo.

### I-verbo

Perverba priskribo de objekto ankaŭ povas esti I-verbo:

- *La finiĝado de la tago igis ilin **rapidi**.* M.200 *= La finiĝado de la tago igis ilin **rapidantaj**. = La finiĝado de la tago kaŭzis, ke ili rapidis.*

Vidu pliajn ekzemplojn en la klarigoj pri I-verboj (§27.3.3) kaj en la klarigoj pri la verbo *igi* (§31.5) kaj la verbo *lasi* (§31.6).

### Kontrolmetodo

Se oni hezitas, ĉu priskribo de objekto estas rekta aŭ perverba, oni povas anstataŭigi la objekton per pronomo (*lin*, *ŝin*, *ĝin*, *ilin* k.s.). Rektan priskribon oni tiam emas forpreni, ĉar ĝi estas parto de la objekto. Perverban priskribon oni tamen emas konservi, ĉar ĝi estas memstara frazparto necesa por la senco de la frazo:

- *Ĉu vi farbas la domon **ruĝan**? → Ĉu vi farbas ĝin?* (*= Ĉu vi farbas la ruĝan domon?*) *Ruĝan* estas rekta priskribo.
- *Ĉu vi farbas la domon **ruĝa**? → Ĉu vi farbas ĝin **ruĝa**? Ruĝa* estas perverba priskribo.
- *Mi vidis miajn amikojn **forirantaj per trajno**. → Mi vidis ilin **forirantaj per trajno**. Forirantaj (per trajno)* devas resti por ke la senco de la frazo ne ŝanĝiĝu. *Forirantaj* estas do perverba priskribo de la objekto, kaj ne havu N-finaĵon. La senco estas: *Mi vidis miajn amikojn, kaj vidis, ke ili estas forirantaj per trajno.* (Anstataŭ *forirantaj* oni ankaŭ povas uzi I-verbon: *Mi vidis miajn amikojn **foriri** per trajno.*) Se oni dirus *forirantaj**n***, la senco fariĝus: *Mi vidis tiujn el miaj amikoj, kiuj estis forirantaj per trajno.* Aŭ: *Mi vidis miajn amikojn, kiam ili estis forveturantaj per trajno.*

### Priskribo pere de participo

Ankaŭ aktiva participo (§28) povas peri priskribon de sia objekto:

- *La geedzoj lasis pretigi por si sian tomban ŝtonon kun surskribo kaj nomoj, lasante **libera** nur la lokon por la jaro de la morto. Libera* estas perverba priskribo de la objekto *la lokon*. Ĝin tamen peras ne verbo, sed la participo *lasante*, kiu devenas de la verbo *lasi*. *= Ili lasis libera nur la lokon ...*
- *Li estis jam farbinta sian domon **verda**.* La priskribon peras la participo *farbinta*.
- *Ŝi sidis tenante la okulojn **fermitaj**. = Ŝi sidis, dum ŝi tenis la okulojn **fermitaj**.*

### *Kun* povas peri priskribon

Iafoje, kiam *kun* kvazaŭ anstataŭas *havanta*, *havante*, *tenanta* aŭ *tenante*, ĝi povas aperi kun "perverba" priskribo de "objekto":

- *Li kuŝis havante/tenante la piedojn **direktitaj al la pordo de la domo**. → Li kuŝis **kun** la piedoj **direktitaj al la pordo de la domo**.* FA1.122

Oni ankaŭ povas simple subkompreni *havante* aŭ *havanta* (aŭ similan participon) sen aldoni *kun*, precipe kiam temas pri pozicio de (korpo)parto (§12.2.6): *Li kuŝis* [havante/tenante] *la piedojn direktitaj al la pordo de la domo.*

## 25.2. Identiga priskribo

O-vorta frazparto povas havi rektan priskribon, kiu montras la identecon de la afero, normale per ĝia propra nomo. Tia **identiga priskribo** staras ĉiam post sia ĉefvorto, kaj ne havu N-finaĵon aŭ rolvorteton:

- *Tio estis en la* <u>*monato*</u> ***Majo***. [FA3.18] La monato nomiĝas "Majo". *Majo* estas identiga priskribo de la vorto *monato*.
- *Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas la* <u>*lingvon*</u> ***Esperanto***. [OV.238] *Esperanto* estas la propra nomo de la lingvo. Kvankam *lingvon* havas N-finaĵon, la identiga priskribo ne havu tiun finaĵon.
- *Ĝis morgaŭ li devis ellerni parkere ĉiujn urbojn en la* <u>*provinco*</u> ***Zelando***. [FA2.130]
- *La* <u>*Florencano*</u> ***Angiolo Bronzino*** *pentris tiun bildon.* [FA1.214]
- *Ni vizitis la* <u>*urbon*</u> ***Parizo***.
- *La ĉefurbo de Britujo estas Londono, sed ankaŭ en Kanado kaj Usono oni havas* <u>*urbojn*</u> ***Londono***.
- *La* <u>*artikolo*</u> ***"la"*** *estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj.* [FE.27]
- *Tiu programero okazos en* <u>*salono*</u> ***Zamenhof***. La salono estas nomata "Zamenhof".

Identigaj priskriboj ofte aperas post titoloj (§9.1.6) kaj similaj esprimoj:

- <u>*Sinjoro*</u> ***Petro*** *kaj lia edzino tre amas miajn infanojn.* [FE.18]
- *En la sekvanta mateno* <u>*patro*</u> ***Giuseppe*** *eliris.* [FA1.218]
- *Karlo vidis tie* <u>*profesoron*</u> ***Paŭlo Jenkins***.
- *domo* <u>*numero*</u> ***naŭdek-sep*** [Rz.95] Ĉi tie *naŭdek-sep* estas identiga priskribo de *numero*, kaj *numero* similas al titolo. Sed krome la tuta esprimo *numero naŭdek-sep* siavice estas identiga priskribo de la vorto *domo*.

Oni povas ofte enmeti *kiu nomiĝas* antaŭ identiga priskribo: *la lingvon, kiu nomiĝas Esperanto*; *la provinco, kiu nomiĝas Zelando*; *la urbon, kiu nomiĝas Parizo*; *profesoron, kiu nomiĝas Paŭlo Jenkins*; *urbojn, kiuj nomiĝas Londono*.

### Malnova uzo

Zamenhof iafoje tamen uzis N-finaĵon ĉe identigaj priskriboj, ĉar liatempe la reguloj ankoraŭ ne estis klaraj: *Vi vidis iam* <u>*la knabon*</u> ***Karolon***. [Rt.91] *Li atingis la ĉarmegan* <u>*urbon*</u> ***Nurenbergon***. [FA3.62] Se oni nun dirus ekz. *la knabon* ***Karolon***, oni komprenus, ke la knabo nomiĝas ĝuste "Karolon", ne "Karolo".

### De

Ne uzu la rolvorteton *de* (§12.3.2.3) antaŭ identiga priskribo: **la urbo* ***de*** *Nov-Jorko**, **la ŝtato* ***de*** *Kalifornio**, **la popola respubliko* ***de*** *Ĉinio**. *De* en tiaj esprimoj povas nur montri apartenon: *la urbo, kiu apartenas al Nov-Jorko*, *la ŝtato, kiu apartenas al Kalifornio*.

*De* povas tamen esti tute ĝusta en iaj esprimoj, kiuj similas al identigaj priskriboj, sed kiuj vere montras apartenon:

- *La rivero Misisipo enfluas en la golfon* ***de Meksiko***. La golfo ne nomiĝas "Meksiko", sed ĝi troviĝas apud la lando Meksiko.
- *Anglujo estas unu parto de la Unuiĝinta Reĝlando* ***de Britujo kaj Norda Irlando***. La reĝlando ne nomiĝas "Britujo kaj Norda Irlando", sed konsistas el la du partoj Britujo kaj Norda Irlando.

En iaj okazoj identiga priskribo kaj apartena *de*-priskribo povas tamen praktike egaliĝi:

- *Oni eldiras la nomon* ***de Molière***. [FA3.55] *= ... la nomon, kiu apartenis al Molière ≈ ... la nomon Molière.*
- *La titolon* ***de honora prezidanto*** *de via grupo mi danke akceptas.* [OV.573] *= La titolon, kiu apartenas al honora prezidanto ... ≈ La titolon "honora prezidanto"...*

### A-vorto

Ankaŭ A-vorto povas montri identecon, nomon (§9.1.6). Tiaj A-vortoj kondutas kiel ordinaraj A-vortaj priskriboj kaj devas ricevi N-finaĵon, se la ĉefvorto havas N: *Mi neniam vidis la* ***Atlantikan*** *Oceanon. = Mi neniam vidis la oceanon Atlantiko.*

## 25.3. Apudmeto

Apudmeto estas postmetita klariga revortigo de frazparto. Ĝi montras la saman aferon per aliaj vortoj. Apudmeto iel priskribas la antaŭan frazparton, sed estas tamen propra frazparto. En la parolo oni normale distingas apudmeton per paŭzetoj antaŭe kaj poste. En la skribo oni kutime metas komojn.

Apudmeto ludas la saman frazrolon, kiel la antaŭa frazparto. Se la antaŭa frazparto havas la rolfinaĵon N, ankaŭ la apudmeto havu tian finaĵon:

- *Karlo*, ***nia prezidanto***, *prezentis Petron*, ***la novan sekretarion***. Kaj *Karlo* kaj *nia prezidanto* estas subjektoj, ili eĉ estas la sama persono. Kaj *Petro* kaj *la nova sekretario* estas objektoj, ĉar ili estas la sama.
- *Tie mi renkontis Vilĉjon*, ***mian edzon***.
- *La diablo lin prenu*, ***la sentaŭgulon!*** [H.150]
- *Malsaĝulo vi nomu lin, malsaĝulo*, ***la maljunan kanajlon!*** [Rz.96]
- *Adam ekkonis Evan*, ***sian edzinon***. [Gn.4]
- *La koko*, ***trumpetisto de l' mateno***, *per sia laŭta, forta, hela voĉo el dormo vekas dion de la tago.* [H.8]

- *Mi scias, ke* <u>*brava homo,*</u> ***metiisto****, svatiĝas al vi,* ***la gantisto Erik****.* [FA3.76] Kaj *metiisto*, kaj *la gantisto Erik*, estas apudmetoj de *brava homo*.

Rolvortetojn oni normale ne ripetas ĉe apudmeto:

- *Li prelegis* <u>*pri Hitlero,*</u> ***la fondinto de la naziismo****.* Oni povus diri: *... pri Hitlero,* ***pri*** *la fondinto ...*
- *Ni esprimas nian koran dankon* <u>*al sinjoro Schleyer,*</u> ***la unua kaj plej energia pioniro de la ideo de neŭtrala lingvo internacia****.* [OV.364] Oni povus diri *... al sinjoro Schleyer,* ***al*** *la unua kaj plej energia pioniro ...*

En solena aŭ emocia parolo tia ripeto de rolvorteto estas tamen malpli malofta:

- *Rememoru* <u>*pri Li,*</u> ***pri la plej pura kaj plej bona*** [persono]*,* ***pri Li, kiun oni mokis kaj alnajlis al la kruco****.* [FA3.71] Ĉi tie oni ripetas *pri* antaŭ la du longaj apudmetoj de *pri Li*. Oni povus forigi la du ripetitajn *pri*, sed tiam la stilo fariĝus malpli solena kaj malpli emocia.

Iafoje oni enkondukas apudmeton per *nome*, *tio estas* aŭ simila esprimo:

- *Mi renkontis* <u>*mian malamikon,*</u> ***nome la mortiginton de mia patro****.*
- *Hodiaŭ mi ricevis* <u>*duoblan pagon,*</u> ***tio estas cent dolarojn****.* Mallongigo de: *Tio estas: mi ricevis cent dolarojn.* Principe *tio estas ...* estas aparta komentofrazo (§32.2), sed rolas praktike kiel apudmeto.

Kiam apudmeto estas longa listo (kutime post dupunkto), plurfoja ripetado de N-finaĵo povas ŝajni peza: *Ni havas* <u>*diversajn servantojn*</u>*:* ***kuiriston, ĉambristinon, infanistinon kaj veturigiston****.* [FE.37] Se oni volas eviti la kvarfojan ripetadon de N-finaĵo en la apudmeto, oni povas revortumi la frazon tiel, ke la ĉefvorto ne plu estas rekta objekto, ekz.: *Ĉe ni laboras* <u>*diversaj servantoj*</u>*:* ***kuiristo, ĉambristino*** *...* Alia solvo estas fari apartan frazon el la apudmeto, ekz.: *Ni havas* <u>*diversajn servantojn*</u>*. Ili estas* ***kuiristo, ĉambristino*** *...*

Ne konfuzu apudmetojn kun identigaj priskriboj (§25.2). Identiga priskribo povas aspekti simile al apudmeto, sed identiga priskribo neniam havu N-finaĵon aŭ alian rolmontrilon. Komparu la jenajn frazojn:

- *Mi renkontis* <u>*profesoron,*</u> ***Paŭlon Jenkins****.* (= *Mi renkontis profesoron. Mi renkontis Paŭlon Jenkins.*) *Paŭlon Jenkins* estas apudmeto. Rimarku, ke estas komo antaŭ la apudmeto. En la elparolo oni ordinare faras paŭzeton ĝuste tie.
- *Mi renkontis* <u>*profesoron*</u> ***Paŭlo Jenkins****.* (= *Mi renkontis tiun profesoron, kiu nomiĝas Paŭlo Jenkins.*) *Paŭlo Jenkins* estas identiga priskribo de *profesoron*. La tuta frazo estas ordinare elparolata kunece, sen paŭzeto antaŭ la identiga priskribo.

Ankaŭ ne konfuzu apudmetojn kun la frazrolo alvoko (§12.1.2), kiu ne havu rolmontrilon: *Sidigu vin* [...], ***sinjoro!*** [FE.39] *Vin* kaj *sinjoro* estas la sama persono, sed *vin* estas objekto, kaj *sinjoro* estas alvoko.

Legu ankaŭ pri la uzo de *si* kaj *sia* en apudmetoj en §11.6.2.

## Apudmetita *ĉiu(j), ambaŭ* aŭ *ĉio*

*Ĉiu(j)* (§15.1), *ambaŭ* (§15.5) kaj *ĉio* (§15.2) povas esti klariga apudmeto de O-vorto aŭ persona pronomo. Se la O-vorto aŭ pronomo havas N-finaĵon, tiam ankaŭ la apudmeto havu tiun finaĵon (krom *ambaŭ*, kiu neniam povas havi N-finaĵon). Ĉi tiaj apudmetoj ne staras ĉiam tuj post la unua frazparto, sed ofte iom pli poste en la frazo:

- *Ni **ĉiuj** legas.* [FE.20] *= Ni legas. Ĉiuj (el ni) legas.*
- *Ili **ĉiuj** sidas silente kaj skribas.* [FE.20] *= Ili sidas. Ĉiuj (el ili) sidas.*
- *Ni **ĉiuj** kunvenis, por priparoli tre gravan aferon.* [FE.42] *= Ni kunvenis. Ĉiuj el ni kunvenis.*
- *Ŝi vidis, kiel la cikonioj forflugis, **ĉiu** aparte.* [FA3.31] *= La cikonioj forflugis. Ĉiu unuopa cikonio forflugis aparte.*
- *La kolonoj havis **ĉiu** la alton de dek ok ulnoj.* [Jr.52] Ĉiu unuopa kolono estis tiel alta.
- *La ŝipanoj ektimis kaj komencis voki **ĉiu** al sia dio.* [Jn.1] Ĉiu el la ŝipanoj vokis al sia propra dio.
- *Vin **ĉiujn** mi kore salutas.* [Rt.90] *= Mi salutas vin. Mi salutas ĉiujn (el vi).*
- *Miajn sagojn Mi **ĉiujn** eluzos kontraŭ ilin.* [Re.32] *= Mi eluzos miajn sagojn. Mi eluzos ĉiujn (el la sagoj).*
- *Ili **ambaŭ** estis bonaj homoj.* [FA1.64] *= Ili estis bonaj homoj. Ambaŭ (el ili) estis bonaj homoj.*
- *Senkulpulon kaj malpiulon Li **ambaŭ** pereigas.* [Ij.9] *= Li pereigas senkulpulon kaj malpiulon. Li pereigas ambaŭ (el ili).*
- *Tio estas **ĉio** tre bona. = Tio estas tre bona. Ĉio (el tio) estas tre bona. Ĉio* povas aperi kiel apudmeto nur de la vorteto *tio*.

## Kunskriboj

Speciala formo de apudmeto estas kunskribo. En kunskribo pluraj (plej ofte du) samspecaj vortoj kunlaboras por esprimi ion specialan. La apartaj vortoj en kunskribo preskaŭ fariĝas unu kunmetita vorto. Oni ofte elparolas ilin senpaŭze (kvazaŭ unuvorte), kaj oni ordinare skribas ilin skribi kune, sed kun dividostreko. Tamen ne temas pri veraj kunmetaĵoj. Gramatike oni plej ofte traktas tian kunskribon kiel du (iafoje pli ol du) apartajn vortojn:

- *Post longa vico da batalado kaj suferoj la "**buboj-fantaziuloj**" atingis la celon.* [FK.154] Ili estis kaj buboj kaj fantaziuloj. La uzo de J-finaĵo ĉe ambaŭ partoj de la kunskribo montras, ke temas vere pri du apartaj vortoj. Se estus vera kunmetaĵo, oni skribus *bubo(-)fantaziuloj*.
- *Pri ĉiu peco de tiu ĉi **gramatiko-vortaro** mi montros, kian formon mi donus al ĝi, se mi komencus la kreadon de la lingvo nun.* [OV.186] La lingvo estas rigardata kiel kunaĵo de gramatiko kaj vortaro.
- *Pluraj **ŝtatoj-membroj** informis pri sia preteco ampleksigi la instruadon de Esperanto. = ... ŝtatoj, kiuj estas membroj* [de UNESKO]... Kaj *ŝtatoj*, kaj *membroj* havas J-finaĵon, ĉar ili estas du apartaj vortoj.

- *UNESKO petas tiujn **ŝtatojn-membrojn** informadi pri la rezultoj.* Ambaŭ vortoj ricevas N-finaĵon, ĉar ili estas apartaj vortoj, kaj ambaŭ estas objekto: *... petas tiujn ŝtatojn ...* + *... petas tiujn membrojn ...*

Iafoje oni disskribas tiajn esprimojn, do kun spaceto anstataŭ dividostreko: *oni donadis ĝin al la **oficistoj laborgvidantoj**, por ke ili rebonigu per tio la domon de la Eternulo* [Rĝ1.12] = *oficistoj-laborgvidantoj*.

Se oni skribus ekz. *ŝtatoj kaj membroj* oni povus eble miskompreni, ke temas pri ŝtatoj (kiuj eble ne estas membroj) kaj membroj (kiuj eble ne estas ŝtatoj). *Ŝtataj membroj* povus eble miskompreniĝi, kiel "membroj, kiuj iel apartenas al ŝtatoj". Tia ĉi precizemo estas karakteriza por administra stilo. Normale tamen sufiĉas simpla vorto kiel *membroŝtatoj* aŭ la tute bona esprimo *membraj ŝtatoj*.

Kunskribado de A-vortoj montras, ke la diversaj A-vortoj kune esprimas ion specialan:

- *La franca flago estas **blua-blanka-ruĝa**.* Oni povus ankaŭ diri *blua, blanka kaj ruĝa*, sed la kunskriba formo montras, ke temas pri unueca difinita kolorkombino.
- *La fotoj ne estis koloraj, sed **nigraj-blankaj**.* Oni povus ankaŭ diri *nigraj kaj blankaj*, sed *nigraj-blankaj* pli emfazas la kontraston al *koloraj*. Temas pri certa speco de foto.

Kunskriboj de O-vortoj kaj A-vortoj estas limokazoj inter apartaj kaj kunmetitaj vortoj. Normale oni traktas ilin kiel apartajn vortojn, kaj aldonas laŭbezone J kaj N ĉe ĉiu parto. Sed iafoje oni traktas ilin kiel verajn kunmetaĵojn, kaj almetas J kaj N nur ĉe la lasta parto: *Pliiĝis la nombro de **membro-abonantoj**. Li faris fotojn **nigra-blankajn**. Mi analizos sisteme kaj radikale la tutan **gramatiko-vortaron** de nia lingvo.* [OV.186]

Kunskribo de E-vortoj kaj vortetoj ofte montras heziton. Oni kunskribas du kontraŭajn vortojn por esprimi, ke estas necerte, kiu el ili validas. Normale temas pri fiksitaj esprimoj:

- *Kio estos, tio estos, mi provos **trafe-maltrafe**.* [Rz.31] = *... mi provos, ĉu trafe, ĉu maltrafe, laŭ ŝanco.*
- ***Vole-ne-vole** li devis konsenti.* [FA2.140] = *Ĉu vole, ĉu ne-vole, li devis konsenti.*
- ***Pli-malpli** unu horon poste Marta eniris en sian ĉambreton en la mansardo.* [M.51] = *Proksimume unu horon poste ...* Iafoje oni povus same bone diri *pli aŭ malpli*, sed tio ne havas vere la signifon *proksimume*.

Simile oni iafoje kunskribas nombrojn por esprimi heziton: *Ĉe la rando de la arbaro, inter **tri-kvar** domoj, estis starigita stango, alta kiel masto.* [FA3.128] = *... inter tri aŭ kvar domoj ...*. La nombro estas malcerta.

Iafoje oni kunskribas E-vorton kun A-vorto, kiun ĝi rekte priskribas, por iel montri pli kunecan signifon: *ore purpura* → ***ore-purpura***, *religio komune homa* → *religio **komune-homa*** [OV.320]. Sola diferenco inter la disskribitaj formoj kaj la kunskribitaj estas, ke la kunskribitaj iel montras pli specialajn ideojn. Tiaj kunskriboj estas nuntempe maloftaj. Oni prefere evitu ilin.

## Komentaj apudmetoj

Iafoje oni uzas apudmetitajn frazpartojn, kiuj ne montras la saman aferon, sed kiuj aldonas ian informon pri la afero. Plej ofte temas pri loko, kie la afero troviĝas, aŭ de kie ĝi devenas. Tiaj komentaj apudmetoj neniam havas N-finaĵon. Oni povus rigardi tiajn apudmetojn kiel mallongigitajn subfrazojn:

- *Prelegis interalie profesoro Kiselman, **Svedujo**. = ... Kiselman, kiu venas el Svedujo.* Oni ankaŭ povas diri: *... Kiselman el Svedujo.*
- *Li naskiĝis en Varburgo, **Vestfalio**. = ... Varburgo, kiu troviĝas en Vestfalio.* Ankaŭ: *... Varburgo en Vestfalio.*
- *Ni vizitis Tokion, **Japanujo**. = ... Tokion, kiu troviĝas en Japanujo.* Aŭ: *... Tokion en Japanujo.*

# 26. Verboj

Vorto kun iu el la finaĵoj AS, IS, OS, U, US aŭ I estas verbo. Verbo montras faradon de ago aŭ estadon en stato.

La diversaj verbfinaĵoj prezentas agojn kaj statojn en kvar malsamaj manieroj – en kvar modoj.

- **Reala modo** (§26.2) – por agoj kaj statoj realaj:
  - **AS**-finaĵo – por nuntempaj agoj aŭ statoj (§26.2.1)
  - **IS**-finaĵo – por pasintaj agoj aŭ statoj (§26.2.2)
  - **OS**-finaĵo – por venontaj agoj aŭ statoj (§26.2.3)
- **Vola modo**: U-finaĵo – por agoj aŭ statoj dezirataj, volataj, ordonataj aŭ celataj (§26.3)
- **Imaga modo**: US-finaĵo – por agoj aŭ statoj imagaj (§26.4)
- **Neŭtrala modo**: I-finaĵo (§26.1)

Nur en la reala modo oni faras distingon inter tri tempoj. La aliaj modoj ne esprimas tempon.

- Verboj kun AS, IS, OS, U aŭ US rolas kiel ĉefverboj de frazo.
- Verboj kun I-finaĵo – I-verboj (§26.1) ne rolas kiel ĉefverbo, sed havas diversajn aliajn rolojn en frazoj. I-verbo estas tradicie rigardata kiel la baza formo de verbo. Tial verboj aperas en I-formo en vortaroj.

Legu ankaŭ pri vortfarado per verbaj finaĵoj en §37.2.4, pri verboj kaj frazroloj en §30, kaj pri kelkaj gravaj verboj en §31.

## 26.1. Neŭtrala modo — I-finaĵo

Verboj kun la finaĵo I nur nomas agon aŭ staton. Ili ne montras, ĉu temas pri realaĵo, volo aŭ imago. Ili ankaŭ ne montras tempon. I-verboj estas ofte similaj al agaj O-vortoj:

- *labori* = la ideo de farado de laboro
- *esti* = la ideo de estado
- *Mi volas **labori**. = Mi volas, ke mi laboru.*
- *Estas tede **labori**. = Laborado estas teda.*

I-verboj ne rolas kiel ĉefverboj, sed estas uzataj en multaj aliaj manieroj. Legu detale pri la uzado de I-verboj en §27.

## 26.2. Reala modo

La reala modo montras agojn kaj statojn realajn kaj efektivajn. En la reala modo oni devas fari distingon inter tri tempoj:

- Nun-tempo: AS-finaĵo (§26.2.1)
- Pasinta tempo: IS-finaĵo (§26.2.2)
- Venonta tempo: OS-finaĵo (§26.2.3)

Legu aparte pri la uzo de verbaj finaĵoj en nerekta parolo en §33.8.1.

### 26.2.1. Nun-tempo — AS-finaĵo

AS-verbo montras, ke la ago aŭ stato estas reala, efektiva, kaj ke ĝi komenciĝis, sed ne finiĝis. Tio signifas, ke la ago aŭ stato okazas ĝuste nun, aŭ ke ĝi okazas kutime, aŭ ke la afero validas ĉiam:

- *laboras* = la ago "labori" komenciĝis sed ankoraŭ ne finiĝis
- *estas* = la stato "esti" komenciĝis sed ankoraŭ ne finiĝis
- *Mi **sidas** sur seĝo.* La sidado estas reala kaj nuna.
- *Mi **estas** advokato.* La profesio estas efektiva kaj nuna.
- *Kvar kaj dek ok **faras** dudek du.* [FE.12] Tio validas ĉiam.
- *Nun mi **legas**.* [FE.20] La legado efektive okazas nun.
- *Hodiaŭ mi **studas** Esperanton.* Mi eble ne studas ĝuste en la momento de parolado, sed mi komencis la hodiaŭan studadon kaj ankoraŭ ne finis ĝin.
- *En la vintro oni **hejtas** la fornojn.* [FE.16] Tio okazas ĉiuvintre, antaŭe kaj estonte.
- *Mi **loĝas** ĉi tie tri jarojn.* Mia loĝado daŭris jam tri jarojn, kaj daŭras plu.
- *Mi jene **konfirmas** vian mendon.* La konfirmo okazas en la momento de skribado aŭ eldirado de la frazo.

Oni ankaŭ kelkfoje uzas AS-tempon, kiam oni citas la vortojn de fama persono (eble jam mortinta). Tiel oni sentigas, ke liaj vortoj estas ĉiam validaj: *Platono **skribas**, ke la plej alta bono estas scio pri la ideoj.*

Iafoje en rakontoj oni uzas AS-tempon por la tempo de la rakonto, por tiu tempo, kiun la rakonto atingis. Tia speciala stilo povas plivigligi la rakontadon:

- *Ne suspektante ion li iradis tra la arbaro. Subite **eksonas** pafo.* Unue la rakontanto uzas IS-verbon por pasinteco, sed poste li ŝanĝas al AS-formo por ke la aŭskultanto aŭ leganto sentu kvazaŭ li mem ĉeestas, kaj povas aŭdi la pafon.

Iafoje la verbo *devi* kun AS-finaĵo signife similas al estonta tempo (§31.7.2).

### 26.2.2. Pasinta tempo — IS-finaĵo

IS-verboj montras, ke la ago aŭ stato estas reala, sed okazis iam antaŭ la momento de parolado. Normale la ago aŭ stato jam finiĝis:

- *laboris* = la ago "labori" okazis antaŭ nun
- *estis* = la stato "esti" okazis pli frue ol nun
- *Mi **sidis** tiam sur seĝo.* La sidado efektive okazis en tiu pasinta tempo.
- *Mi **estis** knabo.* La knabeco estis reala en la pasinta tempo.
- *Hieraŭ mi **renkontis** vian filon, kaj li ĝentile **salutis** min.* [FE.20]
- *Tiutempe oni **loĝis** en kavernoj.* La ago estis kutima tiutempe, sed jam ĉesis.
- *Mi **loĝis** ĉi tie tri jarojn.* Mia loĝado daŭris tri jarojn, sed ne plu daŭras.

Kelkaj lingvoj faras distingon inter ago/stato kiu daŭris, ago/stato kiu plenumiĝis, kaj ago/stato kiu okazis pli frue ol io alia. La Esperanta IS-formo estas uzebla egale pri ĉiaj specoj de pasinteco:

- *Kiam mi **estis** juna, mi **laboris** multe.* Daŭra stato.
- *Hodiaŭ mi **laboris** multe.* Finita ago.
- *Kiam vi **vidis** nin en la salono, li jam antaŭe **diris** al mi la veron.* FE.24 *Diris* okazis pli frue ol *vidis*.

Se oni volas montri nuancojn de pasinta tempo, oni povas uzi diversajn aldonajn vortojn, sed oni ankaŭ povas uzi kunmetitajn verboformojn (§28.4). Preskaŭ ĉiam tamen simpla IS-verbo sufiĉas.

### IS por estonta tempo

Iafoje oni vidas IS-formojn, kiuj montras ion, kio **estonte plenumiĝos**. Tio estas erara. Oni uzu OS-formon, aŭ, se oni volas esti tre preciza, *estos ...inta* (§28.4.1). Do, ne diru: *Mi venos al vi, kiam mi *__finis__* mian taskon.* Diru: *Mi venos al vi, (post) kiam mi **finos** mian taskon.* Aŭ: *Mi venos al vi, kiam mi **estos fininta** mian taskon.*

## 26.2.3. Venonta tempo — OS-finaĵo

OS-tempo montras, ke la ago aŭ stato ankoraŭ ne komenciĝis en la momento de parolado. Kompreneble la estonteco ĉiam estas necerta, sed OS-verbo montras, ke la parolanto pensas, ke la afero vere okazos:

- *laboros* = la ago “labori” ankoraŭ ne komenciĝis sed ja komenciĝos
- *estos* = la stato “esti” ankoraŭ ne komenciĝis, sed post iom da tempo ĝi realiĝos
- *Mi **sidos** poste sur seĝo.* La sidado efektive okazos poste.
- *Mi **estos** riĉulo.* La riĉula stato estas fakto de la estonteco.
- *Mi **rakontos** al vi historion.* FE.18 La rakontado ankoraŭ ne komenciĝis.
- *Morgaŭ **estos** dimanĉo.* FE.20
- *Post cent jaroj oni eble **loĝos** en spacoŝipoj.* La ago estos (eble) kutima en tiu estonta tempo.
- *Mi **loĝos** ĉi tie tri jarojn.* Mia loĝado ankoraŭ ne komenciĝis, sed kiam ĝi komenciĝos, ĝi efektive daŭros tri jarojn.
- *Ankaŭ la eldonadon de la “Biblioteko” ni devas interrompi, sed ankaŭ nur por mallonga tempo, ĝis ni **ordigos** la aferon.* OV.211 Kiam la ordigo de la afero estos kompleta, ni rekomencos la eldonadon. Anstataŭ *ordigos* oni povas ĉi tie uzi *estos ordigintaj* (§28.4.1).

En iaj stiloj de rakontado, en kiuj oni iafoje uzas AS-formon anstataŭ IS-formo por tiu tempo, kiun la rakonto atingis, oni uzas OS-verbojn por tempo iam post tiu tempo: *En 1894 aperas la Ekzercaro, kiu en 1905 **fariĝos** parto de la Fundamento de Esperanto.* Ankoraŭ la rakontanto nur atingis la jaron 1894 uzante pri tiu tempo AS-verbon, kvazaŭ temus pri nuno. Li tamen antaŭmencias aferon de la jaro 1905 uzante OS-verbon, ĉar la rakonto mem ankoraŭ ne atingis tiun jaron.

Iafoje oni vidas tian uzon de OS-formoj ankaŭ en tekstoj verkitaj en IS-formo: *En 1911 formiĝis en Prago socialdemokrata Laborista Asocio Esperantista, kies organo La Kulturo proklamis sloganon, kiu post la milito **fariĝos** la baza konvinko de la plej multaj laboristaj esperantistoj.* Tio estis skribita longe post la milito. Oni prefere uzu IS-verbojn en tiaj okazoj. Oni ankaŭ povas uzi kunmetitan verboformon (§28.4.1) kun ONT-participo (§28.1): *... kiu **estis fariĝonta** la baza konvinko ...*

## 26.3. Vola modo — U-finaĵo

U-formo montras, ke la ago aŭ stato ne estas reala, sed dezirata, volata, ordonata aŭ celata. U-formo ne montras la tempon de la ago, sed la ago ordinare troviĝas en la estonteco:

- *laboru* = la ago "labori" estas dezirata, petata, ordonata aŭ celata
- *estu* = la stato "esti" estas dezirata, petata, ordonata aŭ celata
- ***Sidu** sur seĝo!* Ordono aŭ peto.
- ***Estu** viro!* Ordono aŭ peto.
- *Ludoviko, **donu** al mi panon.* [FE.8]
- ***Diru** al mi vian nomon.* [FE.18]
- *Ne **rigardu** min tiel rigide!* [FA1.7]
- *Ni **legu** la unuan ĉapitron.* Esprimo de deziro.
- *Ĉu ni **iru** al la dancejo?* Demando pri volo. La efektiva senco de tia frazo tamen plej ofte estas ĝentila propono. Komparu kun ĝentilaj petoj ĉi-poste.
- *Ili **leviĝu** kaj **helpu** vin.* [Re.32] La parolanto esprimas sian volon pri ilia agado.
- *Mi serĉas iun, kiu **akompanu** min.* Mi volas akompanon.
- *Ni **komencu*** [...] *niajn laborojn, al kiuj ni **dediĉu** nian plenan atenton.* [OV.406] Ni komencu la laborojn. Ni dediĉu nian atenton al la laboroj.

Ĉe U-verboj oni tre ofte forlasas la subjekton (§32.3), se ĝi estas la pronomo *vi*: *Venu tuj!* = ***Vi** venu tuj!*

### U-modo en *ke*-frazoj

U-modo estas uzata en *ke*-frazoj (§33.2), se la ĉeffrazo iel montras volon, celon, opinion k.s.:

- *Mi volas, ke vi **laboru**.* La laborado estas volata.

- *Li petas, ke mi **estu** atenta.* [FE.26]
- *Estas necese, ke ni nun unu fojon por ĉiam **faru** finon al tiu ĉi stato.* [L2.112]

Iafoje aperas memstaraj deziraj *ke*-frazoj kun neata U-verbo. Oni povas klarigi ilin per subkomprenita ĉeffraza parto. En tiaj *ke*-frazoj oni ofte uzas *nur* (§14.3.14) por emfazi la deziran sencon:

- *Hu! La akvo estas malvarma! Ke mi nur ne **malsaniĝu**!* [FA3.74] *= Mi volas, ke mi ... Dio volu, ke mi ...*
- *La alilandulo tre plaĉas al mi. Ke nur lia barbo ne **kresku**, ĉar tiam li forveturos.* [FA2.141] *= Mi tre volas, ke lia barbo ne kresku, ĉar ...*

En tiaj okazoj oni ankaŭ povas simple ellasi *ke*, farante tute ordinaran ĉeffrazon kun U-verbo: *Hu! La akvo estas malvarma! Mi nur ne **malsaniĝu**!*

Oni iafoje renkontas tiajn *ke*-frazojn sen neo. Ili estas netradiciaj kaj evitindaj: **Ke **vivu** Esperanto!** Oni forlasu *ke*: ***Vivu** Esperanto, sed antaŭ ĉio **vivu** la celo kaj la interna ideo de la esperantismo, **vivu** la frateco de la popoloj, **vivu** ĉio, kio rompas la murojn inter la gentoj, **vivu**, **kresku** kaj **floru** la verda standardo!* [OV.381]

Legu pli detale pri verboformoj en *ke*-frazoj en §33.2.7.

### Ĝentila peto

Por esprimi ĝentile sian volon oni povas uzi la U-formon *bonvolu* (§31.7.3) plus I-verbon:

- ***Bonvolu sidi** ĉi tie!*
- ***Bonvolu fermi** tiun fenestron!*

Nepre ne uzu duoblan U-formon. Ne diru: **Bonvolu sid**u** ...**.

> **Noto:** Zamenhof neniam uzis *bonvolu ...i*, sed la pli simplan formon *volu ...i*, kiu tamen funkcias tute simile: *Bonan tagon, mi petas vin, **volu sidiĝi**.* [Rz.62] Tia uzo de *volu ...i* nuntempe apenaŭ plu aperas.

Kelkaj nuntempe uzas anstataŭe *bonvole ...u*, ekz.: ***Bonvole sidu** ĉi tie!* Tio estas sufiĉe logika alternativo al la tradicia formo *bonvolu ...i*.

Oni povas fari ĝentilan peton ankaŭ per esprimoj kiel *mi petas*, *estu afabla* k.s. kune kun simpla U-verbo:

- *Sidiĝu do, mia kara, **sidiĝu, mi petas**!* [M.81]
- ***Mi petas vin, ne nomu** min plu "majstro".* [OV.409]
- *Sed kial do vi staras? **Estu afablaj, sidiĝu**.* [Rz.31]

## 26.4. Imaga modo — US-finaĵo

US-formo estas uzata por agoj kaj statoj nerealaj, imagaj aŭ fantaziaj. US-formo ne montras la tempon de la ago:

- *laborus* = la ago "labori" estas imagata
- *estus* = la stato "esti" estas imagata
- *Se mi **estus** riĉa, mi ne **laborus**.* Temas pri nerealaj, imagaj stato kaj ago.
- *Se mi **estus** sana, mi **estus** feliĉa.* [FE.20]

- *Se li **scius**, ke mi estas tie ĉi, li tuj **venus** al mi.* [FE.20] La agoj scii kaj veni estas nerealaj, imagataj, dum la stato *estas* ja estas reala.
- *Se mi nur **loĝus** en palaco!* La loĝado estas dezirata, sed mi scias, ke ĝi ne estas ebla, ke ĝi estas nura fantazio.
- *La malfeliĉa knabino, multe kurinte kaj trovinte neniun, kiu **volus** ŝin akcepti, baldaŭ mortis en angulo de arbaro.* [FE.23] Tia persono ne ekzistis, kaj tial la ago "voli ŝin akcepti" estis nur imagata.
- *Mi ne **farus** la eraron, se li antaŭe **dirus** al mi la veron (aŭ se li **estus** dirinta al mi la veron).* [FE.24] Kaj *farus*, kaj *dirus* ĉi tie rakontas pri imagataj agoj en la pasinteco. Se oni volas, oni povas montri la pasintecon per *estus dirinta* (§28.4.1).

### US por mildeco

Oni ankaŭ uzas US-modon por pli milde prezenti petojn aŭ dezirojn:

- *Mi **dezirus** aĉeti kelkajn aferojn.* Reala deziro, sed ĝentile prezentata.
- *Ĉu mi **povus** havi la skribilon?* Tre ĝentila, milda peto.
- *Ĉu vi **bonvolus** paroli iom pli silente?* Tre ĝentila, milda peto.

### US en *se*-frazoj

US-verboj estas ofte uzataj kun la vorteto *se* (§33.5), kiu montras kondiĉon, sed *se* ne aŭtomate necesigas US-formon. Ĉio dependas de la senco. Se temas klare pri imago, oni uzu US, sed se la ago aŭ stato estas reala, oni uzu la realan modon:

- *Se li **estus** ĉi tie, li certe **mirus** pri la malordo.* Oni scias, ke li ne estas ĉi tie, sed se li estus, li certe mirus.
- *Se li **estas** ĉi tie, li certe **miras** pri la malordo.* Eble li estas ĉi tie. Oni ne scias.

### US ne egalas al *estis ...onta*

En kelkaj lingvoj la verboformo por imagataj agoj estas uzata ankaŭ por io, kio iam estis antaŭvidata. Tion Esperanto esprimas per kunmetita verboformo: *estis ...onta* (§28.4.1) aŭ *estis ...ota* (§28.4.2).

### *Povus, devus, volus*

Ĉe la verboj *povi*, *devi* kaj *voli* US-finaĵo ofte havas specialan signifon: §31.7.5.

# 27. I-verboj

## 27.1. I-verboj — bazaj reguloj

La I-formo de verbo montras tute ĝenerale la ideon de farado de ago (aŭ estado en stato). I-verbo ne montras tempon aŭ modon (§26). Tion oni povas nomi **neŭtrala modo**.

I-verboj similas al agaj O-vortoj (§27.7): *kuri* ≈ *kurado*, *sidi* ≈ *sidado*, *esti* ≈ *estado*, *marteli* ≈ *martelado*, *lumi* ≈ *lumado*, *fosi* ≈ *fosado*.

### O-vorteca

I-verbo partoprenas en frazo en tiaj roloj, kiujn normale havas O-vorta frazparto: subjekto, objekto, *pri*-komplemento, k.t.p. I-verbo eĉ povas havi rolvorteton antaŭ si, sed ĝi ne povas ricevi N-finaĵon.

### Tamen verbo

I-verbo povas havi objekton, komplementojn k.t.p., same kiel ĉefverbo. Tial I-verbo tamen estas verbo.

- *manĝi* ***rapide*** – La I-verbo havas E-vortan komplementon de maniero.
- ***poste*** *manĝi* – La I-verbo havas E-vortan komplementon de tempo.
- ***tre*** *voli* – grada komplemento
- *veni* ***tuj*** – tempa komplemento
- *manĝi* ***per kulero*** – maniera komplemento
- *eliri* ***el la domo*** – direkta komplemento
- *manĝi* ***pomon*** – objekto
- ***ion*** *manĝi* – objekto

Komplementoj de I-verbo povas stari ĉu antaŭ, ĉu post la I-verbo, ĉu proksime, ĉu longe for. Oni devas tamen atenti pri la risko de konfuzo kun la komplementoj de la ĉefverbo.

I-verbo kaj ĝiaj objekto, komplementoj k.t.p. rolas kune kiel unu frazparto, kiun oni povus nomi **I-verba frazparto**.

I-verbo tamen ne povas havi propran (gramatikan) subjekton. Oni do ne povas diri: **mi* ***manĝi******, **la knabino* ***esti****** aŭ simile. Plej ofte tamen ekzistas subkomprenata subjekto: **senca subjekto**.

### Senca subjekto de I-verbo

Normale kaj baze la senca subjekto de I-verbo estas la subjekto de la ĉefverbo de la sama frazo:

- <u>*Ili*</u> *volas* ***trinki****.* [FE.9] *Ili* estas gramatika subjekto de la ĉefverbo *volas* kaj senca subjekto de la I-verbo *trinki*.
- <u>*La sakristiano*</u> *iris* ***saluti*** *la virinon.* [FA1.15] Senca subjekto de *saluti* estas *la sakristiano*.

- <u>*La muso kaj Elinjo-fingreto*</u> *havis la permeson* ***promenadi*** *en ĝi* [= la trairejo] *kiom ili volis.* [FA1.46] Temas pri promenado de la muso kaj Elinjo-fingreto.

En iaj frazkonstruoj tiu baza principo tamen ne validas, ekz. kiam la I-verbo mem estas subjekto de la frazo (§27.2), kaj ĉe agoinfluaj kaj observaj ĉef-verboj (§27.3.3).

### Kompleksa verbo

Ofte ĉefverbo + samsubjekta I-verbo formas kvazaŭ unu kompleksan verbon. Tiel estas precipe pri la verboj *povi*, *devi* kaj *voli* + I-verbo (§27.3.1).

### La frazrolo de I-verbo

I-verbo povas roli kiel subjekto, objekto, perverba priskribo aŭ kiel komplemento. I-verbo ankaŭ povas esti rekta (postmetita) priskribo de O-vorto, A-vorto aŭ (malofte) E-vorto (§27.4).

Tre ofte I-verbo rolas kiel *pri*-komplemento, sed tiam oni tamen ne uzas la rolvorteton *pri*. La frazrolon devas montri la kunteksto. Ankaŭ kiam I-verbo rolas laŭsence kiel *por*-komplemento, oni ofte forlasas la rolvorteton *por*. Legu pri I-verboj kun rolvortetoj en §27.5.

Iafoje I-verboj estas uzataj kvazaŭ ĉefverboj (§27.6).

### I-verboj kaj *ke*-frazoj

Ofte oni povas klarigi I-verbon per *ke*-frazo. Multaj (sed ne ĉiuj) I-verboj estas kvazaŭ mallongigitaj *ke*-frazoj:

- *Mi ĝojas* ***vin vidi****!* [H.15] *= Mi ĝojas,* <u>*ke mi vin vidas*</u>*!*
- *Ni intencas nun* ***loĝi en Peterburgo****.* [Rz.90] *= Ni intencas nun,* <u>*ke ni loĝu en Peterburgo*</u>*.*
- *Aĥab* [...] *konvinkis lin* ***iri kontraŭ Ramoton en Gilead****.* [Kr2.18] *= ... konvinkis lin,* <u>*ke li iru kontraŭ Ramoton en Gilead*</u>*.*
- *Mi vidis la knabon* ***kuri****. = Mi vidis,* <u>*ke la knabo kuras*</u>*.*

## 27.2. I-verboj kiel subjekto

I-verbo povas roli kiel subjekto de frazo, kiam oni volas diri, kia estas la ago de la I-verbo. Plej ofte la ĉefverbo estas formo de *esti*, sed ankaŭ aliaj ĉef-verboj povas aperi:

- ***Resti kun leono*** *estas danĝere.* [FE.7] *= La ago resti kun leono estas danĝera. Danĝere* estas perverba priskribo de *resti*. Ĝi havu E-finaĵon, ĉar ĝi estas priskribo de verbo.
- *Nun estis plej bone* ***reveni hejmen****.* [FA2.12] *= La ago reveni hejmen estis nun plej bona.*
- ***Kritiki*** *estas facile,* ***fari*** [estas] *malfacile.* [PE.252]

- *Estis por ŝi plezuro **trempi siajn blankajn manojn en la varma sango de la oferbuĉita ĉevalo**.* [FA4.34] = *La ago trempi siajn blankajn manojn ... estis por ŝi plezuro.*

### Senca subjekto

Kiam I-verbo mem rolas kiel subjekto de frazo, la senca subjekto de la I-verbo ofte estas indiferenta:

- *Estas efektive tre agrable **havi tiajn gajajn najbarojn**!* [FA2.123] La senca subjekto de *havi* estas indiferenta. La afero validas por ĉiu ajn, kiu havas tiajn najbarojn.

Se en ĉi tia frazo la senca subjekto de la I-verbo ne estas indiferenta, oni povas ĝin montri per *al*-komplemento aŭ *por*-komplemento:

- *Restas <u>al mi</u> nur **diri al vi adiaŭ**.* [M.59] Senca subjekto de *diri* estas *mi*. Temas pri tio, ke mi diros al vi adiaŭ.
- *Tedis <u>al ŝi</u> **pensi pri li**.* [BV.38] La persono, kiu pensis, estas ŝi.
- *<u>Al la papo</u> ne estas permesite **edziĝi**.* [FA4.148] La papo ne rajtas edziĝi.
- *Estos <u>por mi</u> granda plezuro **konatiĝi kun vi en Kembriĝo**.* [OV.561] Mi konatiĝos kun vi.

## 27.3. I-verboj en aliaj frazroloj

Plej ofte I-verbo ne estas subjekto, sed rolas en aliaj frazroloj, plej ofte kiel objekto aŭ kiel ia komplemento.

### 27.3.1. I-verboj kune kun *povi*, *devi* kaj *voli*

I-verbo tre ofte dependas de unu el la tri verboj *povi*, *devi* kaj *voli* (§31.7). La I-verbo montras, al kia ago rilatas la povo, devo aŭ volo. La subjekto de la ĉefverbo kaj la senca subjekto de la I-verbo estas ĉiam la sama:

- *Li <u>povis</u> **vidi** nur la eksteran flankon de nia domo.* [FE.31]
- *Mi <u>volas</u> **diri** al vi la veron.* [FE.24]
- *Mi <u>devas</u> **fari** al vi donacon.* [FE.15]
- *Li ne <u>povas</u> **trairi** tra nia mallarĝa pordo.* [FE.33]
- *Mi ne <u>volas</u> **malhelpi** vian ĝojon.* [FA1.73]
- *Lernolibron oni <u>devas</u> **ne tralegi**, sed **tralerni**.* [FE.31]
- *Ne! tiel **daŭri** ne <u>povas</u>! tiel ĉiam **esti** ne <u>devas</u>!* [M.117] Ĉi tia vortordo estas ekstreme malofta. Normale la I-verbo staras post *povi*, *devi* aŭ *voli*.
- *Vi malĉastis kun la filoj de Asirio, ne <u>povante</u> **satiĝi**.* [Jĥ.16] Ĉi tie *satiĝi* rolas kiel objekto de la participo (§28) *povante*, kiu estas farita el la verbo *povi*.
- *Ili prezentas la nombron de tricent mil viroj elektitaj, <u>povantaj</u> **iri en militon** kaj **teni lancon kaj ŝildon**.* [Kr2.25] Du I-verboj rolas kiel rektaj objektoj de unu sama participo.

Principe I-verbo, kiu dependas de *povi*, *devi* aŭ *voli*, estas rekta objekto de tiu verbo. Ĉe *voli* oni uzas ankaŭ ordinarajn O-vortojn kiel rektan objekton:

*La Kongreso tiam ne <u>volis</u>* ***tiun projekton****.* [OV.392] La ebloj uzi rektan objekton de la verboj *devi* kaj *povi* estas tamen tre limigitaj. Oni neniam uzas ĉe ili ordinaran O-vorton kiel objekton: **Li <u>povas</u>* ***dancadon****.** / **Mia fratineto <u>devas</u>* ***endormiĝon****.** Oni ĉiam uzas en tiaj okazoj I-verban formon: *Li <u>povas</u>* ***danci****.* / *Mia fratineto <u>devas</u>* ***endormiĝi****.* Sed oni ja uzas tabelvortojn je O kiel rektan objekton de *devi* kaj *povi*: *Se mi povas lin kisi, vi ankaŭ* ***tion*** *<u>povas</u>.* [FA2.19] Plej ofte oni tamen uzas en tiaj okazoj O-tabelvorton kun la verbo *fari*: *Oni <u>povas</u>* ***tion fari****.* [FA3.55] Krome oni neniam kreas pasivajn formojn (§29.3) de frazoj, en kiuj la ĉefverbo estas *povi*, *devi* aŭ *voli*, kaj en kiuj la rekta objekto estas I-verbo.

### 27.3.2. I-verboj kune kun aliaj verboj

I-verbo povas ankaŭ dependi de aliaj ĉefverboj ol *povi*, *devi* kaj *voli*. La I-verbo estas tiam objekto, *pri*-komplemento, *por*-komplemento (iafoje *al*-komplemento) aŭ perverba priskribo. Normale ankaŭ tiam la subjekto de la ĉefverbo estas senca subjekto de la I-verbo.

#### I-verbo kiel objekto

- *En varmega tago mi <u>amas</u>* ***promeni en arbaro****.* [FE.34] ≈ *... amas promenon ...*
- *Pri tio mi ne <u>bezonas</u>* ***vaste paroli****.* [FK.229] ≈ *... ne bezonas vastan parolon.*
- *Ŝi <u>komencis</u>* ***senti doloron kaj rigidiĝon****.* [M.28] ≈ *Ŝi komencis sentadon de doloro ...*
- *Unu <u>promesis</u> al la alia* ***rakonti al ŝi, kion ŝi vidis****.* [FA1.83] ≈ *... promesis rakontadon ...*
- *Kiam malriĉa virino <u>petos</u> de vi* ***trinki****, vi donos ĝin al ŝi ĝentile.* [FE.17] ≈ *... petos de vi trinkadon ...*
- *Mi <u>provis</u>* ***esti kudristino****, sed mi ial ne sukcesis!* [M.145] ≈ *... provis kudristinan estadon.*
- *"Ho jes", ŝi respondis kun gaja rido kaj <u>daŭrigis</u>* ***kudri diligente****.* [BV.53] ≈ *... daŭrigis diligentan kudradon.*
- *Kiu <u>kuraĝas</u>* ***rajdi sur leono****?* [FE.7] La frazparto *rajdi sur leono* estas ĉi tie klasata kiel objekto, sed oni ankaŭ povas ĝin klasi kiel *pri*-komplementon (kun subkomprenata *pri*). En la praktiko *kuraĝi* estas apenaŭ iam ajn uzata kun ordinara O-vorto kiel objekto aŭ *pri*-komplemento, sed nur kun I-verbo. Oni povas eventuale diri: *Tion mi kuraĝas.* Sed normale oni diras: *Tion mi kuraĝas* ***fari****.*
- *Ŝi etendis ambaŭ manojn al la bona virino, <u>dezirante</u>* ***preni kaj premi ŝiajn manojn****.* [M.91]
- *Ili ankaŭ estis inter la herooj* [...] *<u>povosciantaj</u>* ***ĵeti ŝtonojn kaj pafarkajn sagojn per la dekstra mano kaj per la maldekstra****.* [Kr1.12]

Kvankam ĉi tiaj I-verboj ja rolas kiel objekto, ili ne povas fariĝi subjekto de pasiva frazo (§29.3).

### I-verbo kiel *pri*-komplemento

Kiam I-verbo rolas kiel *pri*-komplemento oni ĉiam forlasas la rolvorteton *pri*:

- *Kaj vi ne hontas **fanfaroni** per ĉi tio?* [Rt.19] ≈ *... hontas pri fanfaronado ...*
- *Feliĉe mi sukcesis **ekbruligi** la fajron.* [FA3.152] ≈ *... sukcesis pri ekbruligado de la fajro.*
- *Mi ĝojas **vin vidi**.* [H.15] ≈ *... ĝojas pri vidado de vi.*
- *Ni ne ĉesos **energie laboradi** por nia kara afero.* [OV.147] ≈ *... ĉesos pri energia laborado ...*
- *Ĉesinte **profeti**, li venis sur la altaĵon.* [Sm1.10] ≈ *Ĉesinte pri profetado ...*

### I-verbo kiel *por*-komplemento aŭ *al*-komplemento

Kiam I-verbo rolas kiel *por*-komplemento oni ofte forlasas la rolvorteton *por*:

- *Nun ili ĉiuj iris **dormi**.* [BV.67] = *... iris por dormi.*
- *Mi rapidis **veni ĉi tien**.* [OV.412] = *... rapidis por veni ...*

Sed tre ofte oni ja uzas *por* antaŭ I-verbo. Legu pli detale en la klarigoj pri I-verboj kun rolvortetoj en §27.5.

Iafoje en tiaj frazoj povas esti pli trafe rigardi la I-verbon kiel *al*-komplementon: *Ĉio prezentis kvazaŭ belegan tapiŝon, kiu invitis **sidi**.* = *... invitis (onin) al sidado.* Sed oni neniam aldonas *al* antaŭ I-verbo.

### I-verbo kiel perverba priskribo

- *Britain* [...] *ŝajnis **subite veni al tiu ĉi sama opinio**.* [BV.30] = *Li ŝajnis subite venanta ...* La I-verbo estas perverba priskribo de la subjekto *li*.

I-verbo kiel perverba priskribo povas ankaŭ havi alian subjekton ol la ĉefverbo: §27.3.3.

## 27.3.3. I-verboj kun alia subjekto

Iafoje la senca subjekto de I-verbo ne estas egala al la subjekto de la ĉefverbo. Tio okazas precipe ĉe **agoinfluaj** kaj **observaj** ĉefverboj:

### Agoinfluaj ĉefverboj

Ĉe multaj agoinfluaj ĉefverboj oni povas uzi I-verbon, kiu esprimas la celitan agon. La senca subjekto de tia I-verbo tiam estas la influata persono (tiu, kiu faru la celitan agon).

Plej ofte la I-verbo tiam rolas kiel rekta objekto de la agoinflua verbo, kaj la influata persono estas *al*-komplemento. Tiel oni uzas ekzemple la verbojn *ordoni*, *doni*, *(mal)permesi*, *(mal)ebligi*, *(mal)konsili* kaj *(mal)rekomendi*:

- *Ili ordonis al mi **veni antaŭ la vesperiĝo**.* [M.8] Senca subjekto de *veni* estas *mi*.
- *Ĝuste tiu guberniestro, kiu estis ordoninta **aljungi lin al la plugilo** [...], fariĝis nun lia kaptito.* [FA3.104] La senca subjekto de *aljungi* estas subkomprenita: La guberniestro ordonis al iu aljungi lin al la plugilo.

- *La reĝo Aĥaŝveroŝ ordonis **venigi al li la reĝinon Vaŝti**.* [Es.1] Senca subjekto de *venigi* estas tiuj, al kiuj la reĝo ordonis. Ili povas aperi kiel *al*-komplemento: *... ordonis al la servantoj **venigi** ...*
- *Mi ne donos al vi **manĝi**, ĝis vi pagos por la antaŭa.* [Rz.22]
- *Se li nur uzas la lingvon Esperanto, ni ne povas malpermesi al li **nomi sin esperantisto**.* [OV.378]
- *Kaj la Amoridoj premis la Danidojn sur la monton, ne permesante al ili **malsupreniri en la valon**.* [Jĝ.2]
- *Ĉu vi permesas* [al mi] ***demandi pri via estimata nomo**?* [FA3.6]
- *Ŝi donis tre precizajn indikojn por ebligi al la ŝoforo **trovi la lokon**.*
- *La kuracisto konsilis al mi **iri en ŝvitbanejon**.* [FE.40]
- *Mi malrekomendis al ili **iri tien**, sed ili tamen iris.*
- *Ĝi povos proponi formon novan* [de vorto]*, kiun ĝi rekomendos **uzadi paralele kun la formo malnova**.* [FAnt.48] La subkomprenata senca subjekto de *uzadi* estas ĉi tie indiferenta (la rekomendo estas direktita al ĉiuj uzantoj de la lingvo). Atentu, ke la vorto *kiun* estas rekta objekto de *uzadi* (ne de *rekomendos*). Legu pli pri tia vortordo en la klarigoj pri antaŭmetado de KI-vortoj en §34.2.1.

  **Noto:** La verbo *promesi* ne apartenas al tiu ĉi grupo: *Mi promesis al li **veni al la festo**. = Mi promesis al li, ke mi venos al la festo.*

Ĉe kelkaj agoinfluaj verboj la influata persono mem ordinare aperas kiel rekta objekto. Tiam la I-verbo anstataŭe rolas kiel *pri*-komplemento, sed la rolvorteton *pri* oni tamen ĉiam ellasas. Tiel oni uzas interalie la verbojn *peti*, *instrui*, *konvinki* kaj *persvadi*:

- *Mi petas vin **ankaŭ poste prunti al mi**.* [FE.14] Sed oni same bone povas diri: *Mi petas al vi **ankaŭ poste prunti al mi**.*
- *Prefere instruu viajn aliajn infanojn **naĝi**!* [FA2.35] Aŭ: *Instruu al viaj aliaj infanoj **naĝi**!*
- *Aĥab* [...] *konvinkis lin **iri kontraŭ Ramoton en Gilead**.* [Kr2.18]
- *Ŝia patro persvadis Elizabeton **fariĝi flegistino**, kvankam ŝi mem preferus esti kuracistino.*

Ĉe la agoinfluaj verboj *inviti*, *voki* kaj *sendi* la influata persono estas rekta objekto, dum la I-verbo rolas laŭsence kiel *por*-komplemento aŭ *al*-komplemento:

- *Li invitis siajn parencojn **manĝi panon**.* [Gn.31] *= ... por manĝi panon / ... al panomanĝado.*
- *Oni vokas la bovon ne **festeni**, sed **treni**.* [PE.294] *= ... ne por festeni, sed por treni / ... ne al festeno, sed al trenado.*
- *Mi sendos **venigi kuracistojn**.* [Rt.124] *= Mi sendos iun **por venigi kuracistojn**. = ... por ke tiu venigu kuracistojn.* Kiam la persono, kiun oni sendas, estas subkomprenata, oni plej ofte uzas I-verbon sen *por*, sed kiam tiu persono ja estas menciita, oni plej ofte aldonas *por*: *La gepatroj komencis sendadi min en kudrejon, **por lerni**.* [M.101] *= ... por ke mi lernu.*

Iafoje ĉe *inviti* kaj *voki* la senca subjekto de la I-verbo tamen ne estas la invitata aŭ vokata persono, sed la subjekto de la ĉefverbo. En tiaj okazoj oni ĉiam aldonas *por* antaŭ la I-verbo: *Mi invitis vin, sinjoroj, al mi,* ***por komuniki*** *al vi tre malagrablan novaĵon.* [Rz.5] = *... por ke mi komuniku al vi ...*

Legu pli pri *por* kaj aliaj rolvortetoj antaŭ I-verboj: §27.5.

Ĉe *igi*, *devigi* (kaj ankaŭ aliaj similaj IG-verboj) kaj *lasi*, la influata persono estas rekta objekto, dum la I-verbo estas laŭsence perverba priskribo de la objekto (§25.1.2):

- *La finiĝado de la tago igis ilin* ***rapidi****.* [M.200] = *... igis ilin rapidantaj.* (*... kaŭzis, ke ili rapidis.*)
- *Ŝi devigis ŝin* ***manĝi en la kuirejo****.* [FE.13]
- *Ŝi ekĝemis kaj lasis* ***fali*** *la manojn.* [M.11] = *... lasis, ke la manoj falu.*
- *Lasu do lin* ***rakonti****!* [FA1.226]

Legu pli pri *igi* kun I-verbo en §31.5, kaj pri *lasi* kun I-verbo en §31.6.

### Observaj k.s. ĉefverboj

Kiam la ĉefverbo estas *vidi*, *aŭdi*, *senti*, *imagi* aŭ simile, povas aperi I-verbo, kiu estas perverba priskribo de la objekto (§25.1.2) de la ĉefverbo. Tiam tiu objekto estas senca subjekto de la I-verbo:

- *Ho, Marion, ke mi denove aŭdas vin* ***paroli****.* [BV.86] *Paroli* estas perverba priskribo de *vin*, la objekto de *aŭdas*. Senca subjekto de *paroli* estas *vi*.
- *Ĝi estis tiel bela kaj kantis tiel, kiel ili neniam aŭdis alian birdon* ***kanti****.* [FA1.68]
- *Mi hodiaŭ matene vidis* ***danci*** *miajn knabinojn.* [BV.29]
- *La patrino vidis sian filon* ***kuri****.* = *La patrino vidis, ke ŝia filo kuras.*
- *En batalo oni ĝojas, vidante la kontraŭulojn* ***fari malprudentaĵon****.*

### I-verbo kiel perverba priskribo de la subjekto

Kiam I-verbo rolas kiel perverba priskribo de la subjekto de la ĉefverbo, la senca subjekto de la I-verbo preskaŭ ĉiam estas io alia ol la ĉefverba subjekto:

- *Ŝia sola plezuro estis* ***sidi en sia ĝardeneto****.* [FA1.90] Subjekto de la tuta frazo estas *ŝia sola plezuro*. La I-verba frazparto *sidi en sia ĝardeneto* estas perverba priskribo de la subjekto. La senca subjekto de *sidi* estas *ŝi*.
- *La unua afero, kiun ŝi faros, estos* ***preni ian honestan nejunan servantinon****.* [M.130]
- *La elekto estas por vi* ***venki aŭ morti****.*

En tiaj okazoj (se la ĉefverbo estas formo de *esti*) oni ofte povas anstataŭe diri, ke la I-verbo estas subjekto (§27.2), dum tio, kio ĉi-antaŭe estas rigardata kiel subjekto, estas perverba priskribo de la subjekto. La efektiva senco de la frazo apenaŭ ŝanĝiĝas.

### 27.3.4. I-verboj — ŝajne pluraj objektoj

En frazoj kun I-verbo ofte povas ŝajni, ke estas pluraj objektoj kun malsama rilato al la ĉefverbo. Tio normale estus eraro. Uzi plurajn objektojn de la sama verbo estas eble nur kiam ili ludas la saman rolon.

Ofte unu el la supozataj objektoj vere estas objekto de la I-verbo, ne de la ĉefverbo:

- *Kiu do instruos **vian filon** timi **diojn*** [...]*?* [Rt.44] *Vian filon* estas objekto de *instruos*. *Diojn* estas objekto de *timi*.

Ofte unu el la supozataj objektoj estas ĝuste la I-verbo. En tiaj okazoj la I-verbo ofte ne estas vera objekto, sed ekz. *pri*-komplemento, sed antaŭ I-verbo oni ĉiam forlasas la rolvorteton *pri* (§27.3.2). Alia eblo estas, ke la alia supozata objekto ne estas vera objekto, sed N-komplemento (§12.2.1):

- *Mi volas, ke oni **min** helpu **forigi** la erarojn, kiujn mi faris.* [DL.11] *Forigi* ŝajnas esti objekto de *helpu*, sed ankaŭ *min* ŝajnas esti objekto de la sama verbo. Oni povas diri, ke *min* ne estas vera objekto, sed ke la N-finaĵo nur anstataŭas la rolvorteton *al*. Alternative oni povas diri, ke *forigi* ne estas objekto, sed ekz. *pri*-komplemento.
- *Mi petas **vin sidiĝi**, sinjoroj!* [Rz.88] Kaj *vin*, kaj *sidiĝi* povas esti rigardataj kiel objekto, sed *sidiĝi* ankaŭ povas esti klasata kiel *pri*-komplemento, kaj *vin* povas esti rigardata kiel N-komplemento (la N-finaĵo tiam havas la signifon de *al*).

Vidu ankaŭ la klarigojn pri verboj kun alternativaj frazkonstruoj (§30.7).

## 27.4. I-verboj kiel rekta priskribo

### Rekta priskribo de O-vorto

I-verbo povas esti rekta priskribo de O-vorto, precipe de aga O-vorto. La I-verbo ĉiam staras post la O-vorto.

Tre ofte la O-vorto kaj la I-verbo laŭsence similas al tuta frazo. Tiam la I-verbo havas tiun saman sencan subjekton, kiun ĝi havus en la plena frazo:

- *Mi alveturis ĉi tien* [...] *kun la firma <u>decido</u> **servi sub vi**.* [Rt.84] (*<u>Mi</u> decidis **servi** sub vi.*)
- *La impresoj de la Bulonja kongreso nur rapidigis nian <u>decidon</u> **publikigi nian Deklaracion**.* [OV.336] (*<u>Ni</u> decidis **publikigi** nian Deklaracion.*)
- *Mi ricevas grandan <u>deziron</u> **edziĝi**.* [FA3.96] (*<u>Mi</u> deziras **edziĝi**.*)
- *Mi volis forpreni de sinjoro Ove la <u>deziron</u> **resti ĉi tie**.* [FA4.84] (*<u>Sinjoro Ove</u> deziris **resti ĉi tie**.*)
- *Ili ricevis la <u>permeson</u> **flugi ankaŭ dum la tago**.* [FA1.32] (*Oni permesis al <u>ili</u> **flugi ankaŭ dum la tago**.*)
- *Forte min doloras la <u>nepovado</u> **helpi vin**.* [M.91] (*<u>Mi</u> ne povas **helpi vin**.*)

En aliaj okazoj la I-verbo pliklarigas la enhavon de la O-vorto. En la sama maniero oni ofte uzas *ke*-frazojn (§33.2.4):

- *Ni havas nun la taskon* ***bruligi lumon por la malalta popolamaso****.* [FA1.199] *= ... la taskon, ke ni bruligu lumon ...*
- *Ni havas la eblon* ***fari tion ĉi per fervojo****.* [FK.282] *= ... la eblon, ke ni faru tion ĉi per fervojo.*
- *Ni donas al fremdlandulino la eblon* ***labori****.* [M.43] *= ... la eblon, ke ŝi laboru.* Ĉi tiu ekzemplo sekvas la principojn de agoinfluaj verboj (§27.3.3): *doni al iu eblon = ebligi ion al iu*.
- *La ideo* ***detronigi Jesuon Kriston por la kristanoj*** [...] *neniam eĉ por unu minuto venis en la kapon de iu homarano.* [OV.330] *= La ideo, ke oni detronigu ...* Ĉi tie la frazparto *la ideo detronigi* mem rolas kiel subjekto (§27.2).
- *Ne venis ankoraŭ la tempo* ***skribi oficialan historion de nia afero****.* [OV.364]
- *Via maniero* ***rigardi la vivon*** *montras, ke via menso ne estas tute neprilaborita.* [M.126]
- *Li havis plenan kaŭzon* ***esti en bona humoro****.* [FA3.121]

Kiam I-verbo rekte priskribas O-vorton, la senco estas ofte tre proksima al intencita ago. Tial oni ofte uzas *por* antaŭ la I-verbo (§27.5): *permeso por eniri*, *eblo por fari ion*, *tempo por skribi*, *maniero por rigardi*. Ĉe iuj O-vortoj oni pli ofte uzas solan I-verbon, dum ĉe aliaj oni preferas uzi *por* + I-verbon. Ekzemple oni uzas *tempo/momento fari ion* kaj *tempo/momento por fari ion* sen signifodiferenco, sed oni uzas nur *loko/spaco por fari ion*, neniam **loko/spaco fari ion**.

### Rekta priskribo de A-vorto aŭ E-vorto

I-verbo povas ankaŭ esti rekta priskribo de A-vorto. La I-verbo tiam staras post tiu A-vorto, al kiu ĝi rilatas. La senca subjekto de la I-verbo estas ĉiam tio, kion la A-vorto priskribas (rekte aŭ perverbe):

- *Mi estas kapabla* ***instrui nur la francan lingvon****.* [M.57] La A-vorto *kapabla* estas perverba priskribo de *mi*. Sekve la senca subjekto de *instrui* estas *mi*.
- *Li venigu knabojn* [...] *kapablajn* ***servi en la palaco de la reĝo****.* [Dn.1] La A-vorto *kapablajn* estas rekta priskribo de *knabojn*. Sekve temas pri tio, ke tiuj knaboj servu en la palaco.
- *Ili estas pretaj* ***fari atencon kontraŭ mia vivo****.* [Rz.30] Faros la eventualan atencon ili.

Se la I-verbo montras intencitan agon, oni ankaŭ povas uzi *por* + I-verbon (§27.5): *kapabla* ***por instrui****, preta* ***por fari****.*

Principe I-verbo povas tute simile priskribi E-vorton, kvankam tio estas praktike tre malofta: *Li eliris sur la straton preparite* ***renkonti*** *tie sian malamikon.* Kiam li eliris, li estis preparita renkonti la malamikon. Ordinare oni povas same bone uzi A-formon, kio kredeble eĉ estas preferinda: *... preparita* ***renkonti*** *tie ...*

## 27.5. I-verboj kun rolvortetoj

Rolvortetoj (§12.3) estas uzataj precipe antaŭ O-vortoj kaj O-vortecaj vortetoj: *sur tablo*, *pri ili*, *sen tiuj* k.s. I-verboj normale ne havas rolvorteton antaŭ si pro sia verbeco.

Sed iafoje oni bezonas montri la frazrolon de I-verbo per rolvorteto. El ĉiuj rolvortetoj tradicie nur *por* (§12.3.6.9), *anstataŭ* (§12.3.6.1) kaj *krom* (§12.3.6.3) estas akceptataj por tia uzo. Al tiu grupeto oni devas aldoni *sen* (§12.3.6.12), kiu nuntempe estas sufiĉe ofte uzata antaŭ I-verbo.

Uzado de aliaj rolvortetoj antaŭ I-verbo ne estas mallogika, sed povas krei miskomprenojn pro la malkutimeco. Ĉe aliaj rolvortetoj ol *por*, *anstataŭ*, *krom* kaj *sen*, oni kutime serĉas alternativajn esprimomanierojn.

### *Por*

- *Tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, **por vidi**, kiel granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino.* [FE.15] = *... por ke ŝi (la feino) vidu ...* La senca subjekto de la I-verbo estas egala al la subjekto de la ĉefverbo.
- *Ni ĉiuj kunvenis, **por priparoli tre gravan aferon**.* [FE.42]
- *Unu fajrero estas sufiĉa, **por eksplodigi pulvon**.* [FE.41]
- *Mi jam estas tro maljuna **por edziniĝi kun viro**.* [Ru.1]
- *La flora burĝono, kiu ne estas sufiĉe forta **por disvolviĝi**, tamen enhavas en si* [...] *ĉiujn ĝermojn por folioj kaj semo.* [FA4.126]
- *Ĉu ni ĉiuj estas pretaj, **por akcepti Alfredon**?* [BV.69] En tiaj ĉi frazoj oni pli ofte uzas I-verbon sen *por* (§27.4): *preta **akcepti***, *kapabla **akcepti*** k.s.
- *Neniu el ili lumas sufiĉe, **por servi kiel strata lanterno**.* [FA2.118]

Se la du subjektoj estas malsamaj, ĉar la ĉefverbo estas agoinflua (§27.3.3), oni uzas plej ofte I-verbon sen *por*, sed ne estas eraro aldoni *por*:

- *Li invitis siajn parencojn **manĝi panon**.* [Gn.31] *= ... por manĝi panon. = ... por ke ili manĝu panon.*
- *Oni vokas la bovon ne **festeni**, sed **treni**.* [PE.294] *= ... ne por festeni, sed por treni. = ... ne por ke ĝi festenu, sed por ke ĝi trenu.*

Post movaj verboj kiel *iri* kaj *kuri*, oni preferas I-verbon sen *por*, sed oni ankaŭ povas uzi *por*. Sed kiam inter la mova verbo kaj la I-verbo estas pluraj aliaj vortoj, oni por klareco prefere ne forlasu *por*:

- *Mi iros **ripozi**.* [FA3.31] *= Mi iros por ripozi.*
- *Ŝi tuj kuris **bati ŝin**.* [FE.21] *= Ŝi tuj kuris por bati ŝin.*
- *Mi prenos miajn glitilojn kaj iros **gliti**.* [FE.34] *= ... kaj iros por gliti.*
- *Ili iris en la belegan tendon **por ripozi**.* [FA1.104] Ĉi tie estas konsilinde uzi *por*, ĉar *ripozi* ne sekvas tuj post la mova verbo *iris*.
- *Vi devas nur iri al la fonto **ĉerpi akvon**.* [FE.17] Estas pli klare diri *por ĉerpi*.
- *Li iris **por kuŝiĝi malantaŭ grenamaso**.* [Ru.3] Ĉi tie oni ankaŭ povas forlasi *por*.

Se I-verbo estas rekta priskribo de O-vorto aŭ O-vorteca vorteto, kaj se laŭsence ĝi esprimas celatan agon, oni normale devas uzi *por* antaŭ la I-verbo:

- *Ĉu vi havas korktirilon,* ***por malŝtopi la botelon****?* FE.34
- *Por kio vi elirigis nin el Egiptujo, por venigi nin al ĉi tiu malbona loko,* [...] *kie ne ekzistas akvo* ***por trinki****?* Nm.20 *= ... akvo, kiu estas por trinki (trinkebla/trinkota akvo).*
- *De du tagoj ŝi ricevis absolute nenion* ***por manĝi****.* FA1.45
- *Li tuj sendos al vi en vian domon tutan regimenton* ***por enloĝigi****.* Rz.70

Sed post kelkaj oftaj abstraktaj O-vortoj oni trovas jen I-verbon sen *por* (§27.4), jen I-verbon kun *por*:

- *Festenon ŝi aranĝis en la plej longa tago, por ke oni havu tempon* ***formanĝi ĉiujn diversajn manĝaĵojn****.* FA4.216
- *Li interrompis por momento sian paroladon eble por tio, ke la juna virino havu tempon,* ***por kolekti siajn fortojn****.* M.73
- *La principo, kiu donis al la homaranoj la eblon* ***krei ponton inter ĉiuj religioj****, estis esprimita* [...] *ĝuste de Hillel.* OV.330
- *Kial ŝi forlasis tiun lokon, en kiu ŝi havis ian ajn eblon,* ***por ion ajn laborenspezi****?* M.177
- *Via maniero* ***rigardi la vivon*** *montras, ke via menso ne estas tute neprilaborita.* M.126
- *Ĉi tio estas la plej eleganta maniero,* ***por akiri al si favoron****.* FA2.27

Simile: *kaŭzo (por) timi*, *kuraĝo (por) fari ion danĝeran*, *rimedo (por) solvi problemon*, *okazo (por) fari ion*.

Oni atentu, ke I-verbo, kiu sekvas post O-vorto (kun aŭ sen *por*), ofte vere rilatas al io alia, ordinare al la ĉefverbo de la frazo:

- *Ho, se mi povus per ia rimedo* ***venigi ilin sur la teron****!* FA3.152 *= Ho, se mi povus* ***venigi ilin sur la teron*** *per ia rimedo!* Komparu: *Mi ne havas rimedon* ***(por) venigi ilin sur la teron****.*
- *Se mi povus tion fari, mi irus nun malsupren sur la glacion* ***por glitkuri****.* FA4.235

Legu ankaŭ pri esprimoj kiel *por tiel diri*, *por paroli sincere* en §27.6.

### *Anstataŭ*

- *La patro,* ***anstataŭ afliktiĝi kiel la patrino****, ofte ridadis kaj koleradis.* M.101
- *La aliaj anasoj preferis naĝadi en la kanaloj,* ***anstataŭ viziti ŝin****.* FA2.34
- ***Anstataŭ ion gajni*** *nia afero nur perdus ĉion, kion ĝi havis ĝis nun.* OV.75 *= Anstataŭ gajni ion ... Anstataŭ tio, ke ĝi ion gajnus ...*

### *Krom*

- *Vi nenion povas fari* ***krom kunbati viajn dentojn*** *kaj* ***elverŝi vian furiozon sur sekan panon****.* Rt.40

- *Kion alian ili ankoraŭ povoscias **krom danci, tordi la piedojn** kaj **fari turnoventon**?* [FA2.95]
- *Ne ekzistas alia bono por la homo, **krom manĝi kaj trinki**.* [Pr.2]

### Sen

*Sen* + I-verbo estas tradicie rigardata kiel eraro, kaj Zamenhof deklaris tian uzon malbona (*Lingvaj Respondoj* p. 102, n-ro 128). Sed *sen* + I-verbo estas fakte tute logika kaj tre oportuna esprimomaniero, kaj ne vere havas sencon eviti tion. Tia uzado jam fariĝis ofta, kaj do apenaŭ povas kaŭzi problemojn de komprenado. Eĉ Zamenhof mem uzis *sen* tiamaniere almenaŭ du fojojn:

- *Li ne povas subskribi per sia nomo* [...] ***sen elmeti sin al ia ankoraŭ ne konata danĝero**.* [BV.31]
- *La suno neniam leviĝas **sen rigardi milojn da sensangaj bataloj**.* [BV.87]
- ***Sen manĝi kaj trinki** oni ne povas vivi.*

Se oni ne volas uzi I-verbon post *sen*, oni uzas O-formon, aŭ *ne* + participon:

- *La grandaj buldogoj* [...] *eksaltis alten, tamen **sen bojado**, ĉar tio estis malpermesita.* [FA2.67] (= *... sen boji ...*)
- *Mi tre volas manĝi: mi diras tion ĉi **sen ŝerco**.* [Rz.25] (= *... sen ŝerci.*)
- *Tiu virino ne foriru de ŝi **sen ricevo de konsilo kaj helpo**.* [M.59] (= *... sen ricevi konsilon kaj helpon.*)
- ***Ne rigardante** dekstren nek maldekstren, la jura konsilisto iris tra la Orienta strato.* [FA1.117] (= *Sen rigardi ...*)
- ***Sen manĝado kaj trinkado** oni ne povas vivi.*

### Aliaj rolvortetoj

Anstataŭ *pri* + I-verbo oni normale uzas I-verbon sen rolmontrilo (§27.3.2). Sed se la senco (la frazrolo de la I-verbo) tiam fariĝus tro malklara, oni anstataŭe uzas *pri* + agan O-vorton:

- ***Pri flugado** oni eĉ ne povis pensi.* [FA4.222] (= **Pri flugi oni eĉ ne povis pensi.**) Ĉi tie ankaŭ estas eble uzi *pripensi*: *Oni eĉ ne povis pripensi flugi.* Tiam la I-verbo *flugi* rolas kiel rekta objekto de *pripensi*. = *Oni eĉ ne povis pripensi flugadon.*
- *Ni parolis **pri rabado kaj malbonagado**.* [Jes.59] (= **Ni parolis pri rabi kaj malbone agi.**)

Ne malofte oni uzas *pri* + agan O-vorton, kvankam ankaŭ estus tute eble uzi I-verbon sen *pri*:

- *Ĉiuj homoj havas la permeson aspiri **pri edziĝo kun ŝi**.* [FA1.69] *= ... permeson aspiri edziĝi kun ŝi.* (= **... permeson aspiri pri edziĝi kun ŝi.**)
- *Ili kuradis sur la kampo kaj estingis la vaglumojn, kiuj bonkore plenumis la peton **pri aranĝo de torĉa procesio**.* [FA2.97] *= ... la peton aranĝi torĉan procesion.* (= **... la peton pri aranĝi torĉan procesion.**)

Inter *antaŭ* kaj I-verbo oni metas la vorteton *ol* (§33.7):

- *Oni devas iri longan distancon, **antaŭ ol veni al la rivero**.* FA1.23 = *... antaŭ ol oni venas al la rivero.*
- ***Antaŭ ol foriri** li ŝlosis la pordon. = Antaŭ ol li foriris ...*

Anstataŭ *post* + I-verbo, oni uzas INT-participon kun E-finaĵo (§28.2), aŭ *post kiam* (§33.4.2) + plenan subfrazon, aŭ *post* + agan O-vorton:

- ***Trovinte** pomon, mi ĝin manĝis.* FE.22 = ***Post kiam mi trovis** pomon, mi ĝin manĝis.* (= **Post trovi** pomon, mi ĝin manĝis.*)
- *La mastrino de la magazeno, **aŭdinte** tiujn vortojn, tute ne ŝajnis mirigita aŭ konfuzita.* M.95
- *Li volis aĉeti por ŝi oran ringon, sed **post pripenso** li tion ne faris.* FA3.59

Anstataŭ *dum* + I-verbo, aŭ *ĝis* + I-verbo, oni uzas *dum* aŭ *ĝis* antaŭ plena subfrazo (*dum* §33.7 kaj *ĝis* §33.7 estas ne nur rolvortetoj, sed ankaŭ frazenkondukiloj):

- *Mi rigardis televidon, **dum mi manĝis**.* (= *Mi rigardis televidon dum manĝi.*)
- *Malĝoje ŝi eliris el la palaco kaj iris dum la tuta tago tra kampoj kaj marĉoj, **ĝis ŝi venis al la granda arbaro**.* FA1.161 (= *... ĝis veni ...*)

Anstataŭ *malgraŭ* + I-verbo oni uzas *kvankam* (§33.7) + plenan subfrazon, aŭ *malgraŭ (tio) ke* + plenan subfrazon:

- *Vi ne scias ludi, **kvankam vi lernis muzikon en la daŭro de naŭ jaroj**.* M.35 = *Vi ne scias ludi, **malgraŭ tio, ke vi lernis muzikon en la daŭro de naŭ jaroj**.* (= *Vi ne scias ludi, malgraŭ lerni muzikon en la daŭro de naŭ jaroj.*)
- ***Kvankam li falis**, li batalis plu. **Malgraŭ (tio) ke li falis**, li batalis plu.* (= *Malgraŭ fali li batalis plu.*)

Iafoje oni povas uzi participon kun E-finaĵo (§28.2): *Eĉ **perdinte** siajn ŝuojn li plukuris. = Kvankam li perdis siajn ŝuojn, li plukuris.* (= *Malgraŭ perdi siajn ŝuojn li plukuris.*)

Anstataŭ *pro* + I-verbo oni uzas *ĉar* (§33.6) + plenan subfrazon, aŭ *pro tio ke* + plenan subfrazon, aŭ (se la senco restas klara) participon kun E-finaĵo (§28.2):

- *La infano ploras, **ĉar ĝi volas manĝi**.* FE.16 = *La infano ploras **pro tio, ke ĝi volas manĝi**. = La infano ploras **volante manĝi**.* (= *La infano ploras pro voli manĝi.*)

Post aliaj rolvortetoj oni uzas agan O-vorton anstataŭ I-verbo:

- *Ve al tiuj, kiuj leviĝas frue matene, por fordoni sin **al drinkado**.* Jes.5 (= *... por fordoni sin al drinki.*)

## Ĉu lingva evoluo?

La ĉi-antaŭaj klarigoj pri rolvortetoj kaj I-verboj priskribas la tradician staton de la lingvo, en kiu regas forta malemo uzi rolvortetojn antaŭ I-verbo (escepte de *por*, *anstataŭ*, *krom* kaj *sen*). En multaj lingvoj oni tamen uzas

rolvortetojn multe pli libere en tiaj konstruoj. La Esperanta tradicio estas malfacile klarigebla per logikaj argumentoj. Esence ĝi estas arbitra tabuo.

Fakte la tradicia tabuo ne ĉiam estis absoluta. Eĉ Zamenhof almenaŭ unu fojon ĝin ignoris:

- *Tio ĉi neniel devus nin deteni* ***de enkonduki*** *tiun ĉi oportunaĵon en nian artan kaj konscie kreitan lingvon.* [LR.72A] (Zamenhof tiel skribis en la jaro 1891 pri la regulo de akcentado.) = *... nin deteni de enkondukado de tiu ĉi oportunaĵo ...*

Pli-malpli ekde la jaro 2000 oni povas rimarki tendencon rompi tiun tabuon, precipe ĉe junaj Esperanto-parolantoj. Pli kaj pli ofte oni aŭdas frazojn kun rolvortetoj kiel *pri*, *pro*, *dum*, *post* k.a. antaŭ I-verbo en maniero, kiu povas soni strange aŭ eĉ erare al tiuj, kiuj alkutimiĝis al la tradicia uzo. Jen tipaj ekzemploj:

- *Li jam aŭdis pri Esperanto kaj esprimis intereson* ***pri lerni*** *la lingvon.* Tradicie: *... intereson lerni la lingvon.*
- *Li ekfamiĝis en Esperantujo* ***pro gajni*** *la ĉefpremion de la Belartaj Konkursoj.* Tradicie: *... ĉar li gajnis ...*
- *Ni ĝoje babilis* ***dum promeni*** *tra la flughaveno.* Tradicie: *... dum ni promenis ...* / *... promenante ...*
- *Tuj* ***post enlitiĝi*** *li ekdormis.* Tradicie: *Tuj post kiam li enlitiĝis ...* / *Tuj enlitiĝinte ...*

En la ĉi-antaŭaj klarigoj de la tradicia uzo multaj ekzemploj de rolvorteto antaŭ I-verbo estas markitaj kiel eraraj aŭ evitindaj, per steletoj. Se daŭros la tendenco al pli vasta uzo de rolvortetoj antaŭ I-verboj, eble en estontaj eldonoj de tiu ĉi gramatiko iuj el tiuj steletoj estos forprenitaj.

Iom simila lingva evoluo okazis pri rolvortetoj antaŭ demandaj subfrazoj (§33.3).

### Atentu tamen pri la senca subjekto

I-verbo preskaŭ ĉiam havas subkomprenatan sencan subjekton, kiu normale estas egala al la subjekto de la ĉefverbo de la sama frazo (§27.3.1). Kvankam en iaj okazoj tiu baza principo ne validas (§27.3.3), estas forte rekomendinde ĝin sekvi, eĉ se oni uzas I-verbojn kun rolvortetoj en netradicia maniero. Jen ekzemploj de uzoj, kiuj ne estas aprobeblaj:

- **Kiam temas* ***pri ludi ŝakon****, li ĉiam interesiĝas.** Laŭ la normalaj principoj la senca subjekto de *ludi* devas esti egala al la subjekto de *temas*, sed (en tiu ĉi frazo) *temas* estas sensubjekta (§30.1). Oni do diru: *Kiam temas* ***pri ŝakludado*** *....*
- **Ankaŭ* ***dum ridi*** *povas dolori la koro.** Ne la koro ridas, sed la homo. Sekve oni diru: *Ankaŭ* ***dum ridado*** *povas dolori la koro.* [SS.14]
- **Mi konas lin* ***pro gajni*** *la ĉefpremion de la Belartaj Konkursoj.** Ne mi gajnis la premion, sed li. Sekve estu: *Mi konas lin,* ***ĉar li gajnis*** *...*

Vidu ankaŭ la klarigojn pri la diferenco inter I-verboj kaj agaj O-vortoj (§27.7).

### Rolvorteto antaŭ citata I-verbo

Se I-verbo estas citata (§36), oni povas uzi ĉiun ajn rolvorteton. Tiam la rolvorteto vere rilatas al subkomprenata esprimo kiel *la vorto*, *la verbo*, *la ago* aŭ simile: ***Inter voli*** *kaj* ***fari*** *estas grandega, grandega paŝo.* [OV.422] = *Inter* ***la ago voli*** *kaj* ***la ago fari*** *...*

## 27.6. I-verboj kvazaŭ ĉefverboj

Normale I-verbo ne povas esti ĉefverbo (§3.2), sed okaze oni vidas frazojn, en kiuj la sola verbo estas I-verbo. Sed ankaŭ en tia uzo I-verbo ne povas havi gramatikan subjekton.

Ĉefverbecaj I-verboj aperas en iaj mallongigitaj subfrazoj. La I-verbo tiam sence egalas al U-formo aŭ esprimo kun *povi*:

- *Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon, kaj mi de teruro ne sciis, kion* ***fari****.* [FE.38] = *... kion mi faru.*
- *Mi efektive jam ne scias, kiel ĝin* ***klarigi****.* [M.85] = *... kiel mi ĝin klarigu.*
- *La vidvino staris senmove, videble ne sciante, kion* ***fari*** *kaj al kiu sin* ***turni****.* [M.11] = *... kion ŝi faru kaj al kiu ŝi sin turnu.*
- *Ili ne havas, kion* ***manĝi****, ili ne havas, per kio* ***hejti*** *la fornon.* [M.102] = *Ili ne havas (ion), kion ili/oni povus manĝi, ili ne havas (ion), per kio ili povus hejti la fornon.*
- *Mi havis tiam apud mia domo foson, kiu, se* ***preni*** *la plej malmulte, havis almenaŭ ok futojn da larĝeco.* [Rt.19] = *... se oni prenu la plej malmulte ...*
- *Se lin* ***kompari*** *kun la nuna reĝo, li estis Apolono ĉe Satiro.* [H.14] = *Se oni lin komparu kun la nuna reĝo ...*

Ĉefverbecaj I-verboj aperas ankaŭ en iaj mallongigitaj esprimoj de dubo aŭ hezito. La plena frazo havas verbon en U-formo, okaze en US-formo aŭ OS-formo:

- ***Plialtigi*** *la temperaturon de la ĉambro! per kio?* ***acêti*** *medikamenton! Per kio?* [M.196] = *Per kio mi plialtigu ... Per kio mi aĉetu ...*
- *Ĉu* ***esti*** *aŭ ne* ***esti****, – tiel staras nun la demando.* [H.74] = *Ĉu mi estu aŭ ne estu ...*
- *Kion* ***fari****?* [M.19] = *Kion oni/mi/vi faru?*
- *Eble el la vestoj ion* ***forkomerci****?* ***Vendi*** *ekzemple la pantalonon?* [Rz.26] = *Ĉu mi eble el la vestoj ion forkomercu? Ĉu mi vendu ekzemple la pantalonon?*

Iafoje oni vidas I-verbojn uzatajn anstataŭ ordonaj U-formoj. Tiam la ordono ricevas nuancon neŭtralan, nek ĝentilan nek malĝentilan, sed simple konstatan. La senca subjekto de la I-verbo estas tute ĝenerala *oni*. Tiu uzo estas malofta:

- *Nur* ***prunti****, sed ne* ***restigi*** *al si!* [FA3.129] = *Oni povas nur prunti ...* Anstataŭ ordoni per U-formo, la parolanto eldiras sian volon kiel simplan konstaton de nediskutebla fakto.

- *Por landoj ne menciitaj en la listo sin **turni** al LF-KOOP, Svislando.* Simpla konstato, kiel oni agu por mendi ion de LF-KOOP.

En komputilaj interfacoj, menuoj de programoj, k.s., oni ordinare uzas I-verbojn por diversaj elekteblaj agoj: ***konservi** dokumenton*, ***ŝargi** dokumenton*, ***serĉi** tekston* k.s. La logiko estas, ke tiuj estas agoj, kiujn la uzanto de la programo povas elekti: *se vi volas **konservi** la dokumenton, alklaku ĝi tiun menueron*. Sed estas ankaŭ tute eble en tia kunteksto uzi ordonajn U-formojn, se oni pensas pri tio, ke la uzanto de la programo ordonas al la programo fari la koncernan agon.

La specialaj esprimoj *se tiel diri*, *se paroli sincere* k.s. montras manieron de rigardado, vidpunkton, k.s. Oni povas ankaŭ uzi *por* anstataŭ *se*, sed *se* estas pli klara:

- ***Se paroli sincere**, li tute ne plaĉas al mi. = Se mi parolu sincere ...*
- *Li estas, **se tiel diri**, sia propra malamiko. = ... se oni povus tiel diri ...*

Krome oni iafoje uzas I-verbojn en rakontoj anstataŭ ĉia ajn ĉefverba formo por montri primitivan (eraran) lingvaĵon: *Ĉu vi *manĝi* nun?*

## 27.7. I-verboj kaj agaj O-vortoj

I-verboj kaj agaj O-vortoj estas similaj, sed ekzistas tamen diferenco. I-verbo havas ĉiam subkomprenatan sencan subjekton, kiu plej ofte estas identa al la subjekto de la ĉefverbo. Aga O-vorto estas tamen sendependa de subjekto. Aga O-vorto nomas agon sen konsideri eventualan faranton. La signifo de frazo povas do ŝanĝiĝi, se oni ŝanĝas I-verbon en agan O-vorton:

- *Malbonaj infanoj amas **turmenti** bestojn.*[FE.33] *= Ili amas, kiam ili mem turmentas bestojn.*
- *Malbonaj infanoj amas **turmentadon** de bestoj. = Ili amas turmentadon de bestoj, ĉu ili mem turmentas, ĉu iu alia turmentas.*
- *Mi promesis **amuziĝi**. = Mi promesis, ke ĝuste mi amuziĝos.*
- *Mi promesis **amuziĝon**. = Mi promesis, ke okazos amuziĝo.* Ne gravas, kiu amuziĝos.
- ***Labori** estas lacige.* Laborado estas laciga ĝuste por tiu, kiu laboras.
- ***Labor(ad)o** estas laciga.* Laborado estas laciga ĝenerale, eble ne nur por la laboranto.

Ĉe verboj oni klare distingas inter ekz. *komenci* kaj *komenciĝi*, *fini* kaj *finiĝi* k.t.p. Ĉe la respondaj O-vortoj la simpla formo sen la sufikso IĜ (§38.2.18) povas esti uzata por ambaŭ sencoj. Ekz. *komenco* estas kutime uzata ankaŭ por la ideo *komenciĝo*, kaj *fino* havas ofte la sencon de *finiĝo* k.t.p.:

- *Ĉiam la okuloj de la Eternulo, via Dio, estas sur ĝi, de la **komenco** de la jaro ĝis la **fino** de la jaro.*[Re.11] *= ... de la komenciĝo de la jaro ĝis la finiĝo de la jaro.* (= *... de la tago, en kiu la jaro komenciĝas, ĝis la tago, en kiu la jaro finiĝas*). La vortoj *komenco* kaj *fino* estas tre kutimaj, dum *komenciĝo* kaj *finiĝo* aperas nur malofte. (Zamenhof tamen uzis *finiĝo* por la senco de *finaĵo*, sed tiu uzo estas nun arĥaika.)

- *En la eksteraĵo de la infano* [...] *montriĝis ankoraŭ pli grandaj kaj pli profundaj* ***ŝanĝoj****, ol en la eksteraĵo de la patrino* M.127 = ... *pli profundaj ŝanĝiĝoj* ...

Ĉe iuj agaj O-vortoj, ekz. *nasko*, tia uzo tamen povas esti tro malklara. Oni teorie povas uzi *nasko* ankaŭ kiam la senco estas tiu de *naskiĝo*, sed tio povas krei miskomprenon, kaj tial oni ordinare distingas inter *nasko* = "la ago naski (infanon)" kaj *naskiĝo* = "la ago naskiĝi".

# 28. Participoj

Participo estas vorto, kiu prezentas agon aŭ staton kvazaŭ econ de ĝia subjekto aŭ objekto. Participojn oni formas per specialaj participaj sufiksoj. Ekzistas ses participaj sufiksoj, tri aktivaj (ANT, INT, ONT) kaj tri pasivaj (AT, IT, OT).

## 28.1. Participoj kiel A-vortoj

Participo kun A-finaĵo prezentas agon aŭ staton kiel priskribon. Oni uzas diversajn formojn depende de tio, ĉu en la priparolata tempo la afero ankoraŭ ne finiĝis, jam finiĝis, aŭ ankoraŭ ne komenciĝis.

### Aktivaj participoj

Aktiva participo prezentas agon aŭ staton kiel priskribon de ĝia subjekto:

| | | | |
|---|---|---|---|
| **ANT** | dum la ago<br>– la ago ankoraŭ ne finiĝis | *leganta* | = kiu ankoraŭ legas |
| **INT** | post la ago<br>– la ago jam finiĝis | *leginta* | = kiu antaŭe legis |
| **ONT** | antaŭ la ago<br>– la ago ankoraŭ ne komenciĝis | *legonta* | = kiu poste legos |

- *Viro, kiu ankoraŭ legas, estas **leganta** viro.*
- *Viro, kiu antaŭe legis, estas **leginta** viro.*
- *Viro, kiu poste legos, estas **legonta** viro.*

### Pasivaj participoj

Pasiva participo prezentas agon aŭ staton kiel priskribon de ĝia objekto.

| | | | |
|---|---|---|---|
| **AT** | dum la ago<br>– la ago ankoraŭ ne finiĝis | *legata* | = kiun oni ankoraŭ legas |
| **IT** | post la ago<br>– la ago jam finiĝis | *legita* | = kiun oni jam legis |
| **OT** | antaŭ la ago<br>– la ago ankoraŭ ne komenciĝis | *legota* | = kiun oni poste legos |

- *Libro, kiun oni ankoraŭ legas, estas **legata** libro.*
- *Libro, kiun oni antaŭe legis, estas **legita** libro.*
- *Libro, kiun oni poste legos, estas **legota** libro.*

Pasivaj participoj estas eblaj nur ĉe agoj, kiuj povas havi objekton. Oni ne povas diri ekz. **okazata**, ĉar *okazi* neniam povas havi objekton. Ĉiuj verboj kun IĜ-sufikso estas senobjektaj. Tial **...iĝata**, **...iĝita** kaj **...iĝota** neniam estas eblaj.

Iuj verboj, kiuj ordinare estas senobjektaj, kaj kiujn oni ordinare ne uzas kun rekta objekto, kaj el kiuj oni ordinare ne kreas pasivajn participojn, tamen

iafoje ja estas uzataj kun rekta objekto. Ekz. *loĝi* ordinare estas senobjekta. Oni diras *Li loĝas en tiu urbo*. Sed iafoje, tamen tre malofte, oni traktas *loĝi* kiel objektan verbon: *Li loĝas tiun urbon.* Tiam eblas la participaj formoj *loĝata*, *loĝita* kaj *loĝota*: *Urbon **loĝatan** ili ne trovis.* [Ps.107] = *Urbon, en kiu iu loĝas, ili ne trovis.*. Alia tia verbo estas *iri*. Plej ofte oni diras, ke iu iras ekz. *sur strato* aŭ *laŭ vojo*, sed oni ankaŭ povas uzi rektan objekton: *Li piede ekiris la vojon.* [FA3.59] Oni do ankaŭ povas diri ekz. *irota vojo* = "vojo, kiun oni intencas iri", kvankam tio okazas nur malofte. Simile oni uzas ĉe tiaj verboj iafoje la sufiksojn EBL (§38.2.7), IND (§38.2.21) kaj END (§38.2.12).

N-finaĵo povas montri ankaŭ aliajn aferojn ol objekto (§12.2). Se ne temas pri vera objekto oni ne povas uzi pasivan participon.

## La vokaloj de la participoj

La vokaloj en la participoj estas la samaj kiel la vokaloj en la verbaj finaĵoj AS, IS kaj OS (§26.2). Ankaŭ la signifoj estas tre similaj, sed ne tute samaj.

ANT, AT kaj AS ĉiuj signifas, ke la ago komenciĝis, sed ne finiĝis. AS montras ĉefe nuntempecon de la ago, dum ANT kaj AT montras daŭrecon aŭ ripetadon de la ago:

- *Li **skribas**.* La skribado okazas nun aŭ kutime.
- *Tiam li estis **skribanta** en sia ĉambro.* La skribado estis daŭra en tiu pasinta tempo.
- *La letero estis **skribata** en la paŭzo.* La skribado estis daŭra en la paŭzo.
- *Janjo havis en tiu nokto dormon maltrankvilan kaj **interrompatan**.* [M.176] Okazis ripete interrompoj de la dormo.

INT, IT kaj IS ĉiuj signifas, ke la ago finiĝis. IS montras, ke la ago okazis antaŭ la nuno. INT kaj IT montras, ke la ago plenumiĝis, eventuale antaŭ alia ago:

- *Li **skribis**.* La skribado okazis pli frue ol nun.
- *Kiam li estis **skribinta** la leteron, li foriris.* Post kiam la skribado finiĝis, li foriris.
- *Li sendis la **skribitan** leteron al sia amiko.* La skribado de la letero okazis pli frue ol la sendo.
- *La letero estis **skribita** en la paŭzo.* La skribado ne okazis antaŭ la paŭzo, sed iam en la paŭzo la skribado atingis sian finon. La letero do pretiĝis en la paŭzo.

ONT, OT kaj OS ĉiuj signifas, ke la ago ankoraŭ ne komenciĝis. OS montras tempon post la nuno. ONT kaj OT montras staton antaŭ la komenco de la ago, ofte kun nuanco, ke oni intencas fari la agon, ke oni planas ĝin, aŭ ke ĝi baldaŭ okazos:

- *Li **skribos**.* La skribado iam poste okazos.
- *Li estis **skribonta** la leteron, sed devis subite foriri.* La skribado estis intencita, sed tamen ne okazis.

- *Sur la tablo kuŝis aro de **legotaj** leteroj.* La leteroj atendis la legadon. Iu devus ilin legi, sed ankoraŭ ne faris tion.

### Aliaj participoj

Iuj eksperimentas kun participoj respondaj al la US-finaĵo, *UNT* kaj *UT*: **skribunta viro** = "viro, kiu skribus", **skributa letero** = "letero, kiun oni skribus". Sed tiuj participoj ne estas parto de la oficiala Esperanto. Se oni uzas ilin, oni ofte ne sukcesas kompreniĝi. Nur en ŝerca uzo ili povas esti tolerataj.

La sufikso END (§38.2.12) similas al pasiva participo responda al la U-finaĵo: *skribenda letero* = "letero, kiun oni skribu". Ankaŭ la sufiksoj EBL (§38.2.7) kaj IND (§38.2.21) similas al pasivaj participoj.

## 28.2. Participoj kiel E-vortoj

### Komplemento de verbo

Participo kun E-finaĵo plej ofte rolas kiel komplemento de verbo (§6.2). Tiam ĝi montras kroman agon, kiu rilatas al la subjekto de tiu verbo. Anstataŭ diri du frazojn, unu por ĉiu ago, oni kunmetas la frazojn al unu:

- *Li legis sian libron kaj manĝis samtempe pomon.* → ***Manĝante** pomon li legis sian libron. = Dum li manĝis (estis manĝanta) pomon, li legis sian libron.* La manĝado daŭris samtempe kun la legado.
- *Li faris sian taskon. Poste li iris hejmen.* → ***Farinte** sian taskon li iris hejmen. = Kiam li estis farinta sian taskon, li iris hejmen.* La farado de la tasko finiĝis antaŭ ol li iris hejmen.
- *Li intencis skribi leteron. Tial li kolektis siajn skribilojn.* → ***Skribonte** leteron li kolektis siajn skribilojn.* La leterskribado estis planata, sed antaŭ ol ĝi komenciĝis, okazis la kolektado.
- *Ili laboris. Samtempe la mastro rigardis ilin.* → *Ili laboris **rigardate** de la mastro. = Ili laboris, dum ili estis rigardataj de la mastro.* La laborado kaj la rigardado okazis samtempe.
- *Mi tute ne atendis lin, sed li tamen venis al mi.* → *Li venis al mi tute ne **atendite**.* [FE.22] La atendado (kiu ne okazis) estus pli frua ol lia venado.
- *Oni preskaŭ kaptis lin, sed li forkuris.* → ***Kaptote** li forkuris.* Kiam la forkuro okazis, la kaptado estis en la tuja estonteco.

Tiaj kunmetitaj frazoj estas plej oftaj en la skriba lingvo. Ili prezentas malsimplan rilaton inter pluraj aferoj en tre densa kaj iom malfacila formo. La parola lingvo ofte esprimas tiajn aferojn per pli multaj vortoj.

En tiaj frazoj la E-vorta participo devas laŭsence esti priskribo de la subjekto de la ĉefverbo:

- ***Farinte** la taskon <u>li</u> iris hejmen.* Li faris la taskon.
- *<u>Ili</u> laboris **rigardate**.* Ili estis rigardataj.

Ne diru do: ****Promenante** sur la strato venis subite ideo al mi en la kapon.** La subjekto de la ĉefverbo *venis* estas *ideo*. La frazo do signifas, ke la ideo

estis promenanta sur la strato, kio verŝajne ne estas la dezirata signifo. Diru: ***Promenante*** *sur la strato mi subite ekhavis ideon en la kapon.* Aŭ: *Kiam mi promenis sur la strato, venis subite ideo al mi en la kapon.*

Ofte oni povas uzi A-finaĵon aŭ E-finaĵon ĉe tia participo kun nura nuanca diferenco: *La dika ŝafa pelto,* ***malsekigite*** *de sango* [post kiam sango ĝin malsekigis], *rigidiĝis de frosto. La dika ŝafa pelto,* ***malsekigita*** *de sango* [kiu estis malsekigita de sango], *rigidiĝis de frosto* [FA1.227] La E-formo emfazas la tempan sinsekvon (la rigidiĝo okazis post la malsekigo), dum la A-formo akcentas la staton de la pelto, kiam ĝi rigidiĝis.

Iafoje estas pli vere, ke laŭsence tia E-participo priskribas la agon de la ĉef-verbo: *Li* ***nerimarkite*** *eliris.* [FA1.219] Li estis nerimarkita, sed precipe lia elirado estis nerimarkita. La E-participo rolas kiel komplemento de la verbo *eliris* kaj sekve priskribas tiun agon.

E-participo ankaŭ ne povas havi propran subjekton. Ne diru ekz.: **La infanoj* ***veninte*** *hejmen, li povis trankviliĝi.** Tiaj frazoj estas eblaj en iuj lingvoj, sed en Esperanto oni devas diri ekz.: *Kiam la infanoj estis venintaj hejmen, li ... Kiam la infanoj (jam) venis hejmen, li ... Vidinte, ke la infanoj venis hejmen, li ...*

## Rilate al A-vorto aŭ E-vorto

Participo havu E-finaĵon ankaŭ kiam ĝi estas rekta priskribo de A-vorto aŭ E-vorto (§6.2):

- *Ŝi estis tiel* ***ravante*** <u>*bela*</u>*, ke la kortego ankoraŭ pli profunde kliniĝis antaŭ ŝi.* [FA1.171] Ŝi, aŭ pli ĝuste ŝia beleco, estis ravanta. Ŝi/ĝi ravis la homojn.
- *Ili ĉiuj estas* ***frapante*** <u>*similaj*</u> *al sia patro.* [FA2.35] Ilia beleco estis (kvazaŭ) frapanta. Ĝi (kvazaŭ) frapis tiujn, kiuj rigardis ilin.
- *Subite ekbruis la muziko, forte kaj* ***ravante*** <u>*bele*</u>*.* [FA3.65] La muziko ravis per sia beleco.

En la praktiko oni multe pli ofte uzas ne-participajn E-vortojn en tiaj okazoj: *rave bela*, *(okul)frape similaj*, *brile bona* k.s.

E-participo iafoje eĉ povas esti rekta priskribo de E-vorteca vorteto: *Ili alvenis* ***neatendite*** <u>*baldaŭ*</u>. (La baldaŭeco estis neatendita.)

## Rilate al subfrazoj, I-verboj aŭ sensubjekte

Participo havu E-finaĵon ankaŭ kiam ĝi estas perverba priskribo (§25.1.1) de subfrazo aŭ de I-verbo, kaj kiam ĝi estas perverba priskribo en sensubjekta frazo:

- *Estis* ***antaŭdirite****, ke ŝi edziniĝos kun tute simpla soldato.* [FA1.8] La *ke*-frazo estas subjekto. *Antaŭdirite* estas perverba priskribo de la *ke*-frazo.
- *Estas* ***malpermesate*** *fumi ĉi tie.* Subjekto estas *fumi*. *Malpermesate* priskribas la subjekton.
- *Estis ŝajne baldaŭ* ***pluvonte****, kiam mi foriris. Pluvonte* estas perverba priskribo en sensubjekta frazo. Ĝi iel priskribas la tutan situacion.

- *Sciu, ke al iu, kiu mortigos Kainon, estos **venĝite** sepoble.* [Gn.4] *Venĝite* estas perverba priskribo en sensubjekta pasiva frazo.

Legu pli pri pasivaj frazoj kun E-finaĵa participo en §29.1.

Iafoje E-participo povas esti priskribo de tuta frazo, de kiu ĝi ne estas parto: ***Konsentite**, <u>ni agu tiel</u>. = Estas **konsentite**, <u>ke ni agu tiel</u>. **Honeste esprimite**, <u>li faris grandan eraron</u>. = Estas **honeste esprimite**, <u>ke li faris grandan eraron</u>.* Rimarku, ke en tiaj okazoj la E-participo ne estas komplemento de verbo en la frazo (*agu*, *faris*), sed rilatas al la frazo kiel tuto. Legu pli pri tia uzo de E-vortoj rilate al tuta frazo en §6.2.

## 28.3. Participoj kiel O-vortoj

Aktiva participo kun O-finaĵo montras **la sencan subjekton** de la ago aŭ stato. Pasiva participo kun O-finaĵo montras **la sencan objekton**. Normale temas pri **persono**:

- *skribanto* = skribanta persono, persono kiu skribas
- *skribinto* = skribinta persono, persono kiu antaŭe skribis
- *skribonto* = skribonta persono, persono kiu poste skribos
- *amato* = amata persono, persono kiun iu amas
- *amito* = amita persono, persono kiun iu antaŭe amis
- *amoto* = amota persono, persono kiun iu poste amos
- *Kiam Nikodemo batas Jozefon, tiam Nikodemo estas la **batanto** kaj Jozefo estas la **batato**.* [FE.22]
- *Li estas nur unufoja **mensoginto** dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam **mensoganto**.* [FE.22]
- *Oni levis la kadavran tukon; paco estis sur la vizaĝo de la **mortinto**.* [FA3.17]
- *La soldatoj kondukis la **arestitojn** tra la stratoj.* [FE.22]
- *Ĉiuj viaj fortikaĵoj estas kiel figarboj kun maturaj fruktoj; se oni ekskuas ilin, ili falas en la buŝon de **manĝonto**.* [Naĥ.3]
- *Homo, kiun oni devas juĝi, estas **juĝoto**.* [FE.22]

### Nepersona O-participo

Se temas ne pri persono, sed pri aĵo, oni aldonu la sufikson AĴ (§38.2.3):

- *Li disvolvis antaŭ ili ambaŭ la belecon de la naturo en la **kreitaĵo**, kiel la **vivantaĵo** staras super la **mortintaĵo**.* [FA4.152]
- *Laŭ ili oni povis antaŭdiri la **okazontaĵojn** de la venonta jaro.* [FA1.130]

Sed kiam ĉeestas AĴ, la participa sufikso ofte estas superflua: *kreaĵo* (= *kreitaĵo*), *vivaĵo* (= *vivantaĵo*), *skribaĵo* (= *skribitaĵo*), *okazaĵo* (= *okazantaĵo*, *okazintaĵo* aŭ *okazontaĵo* depende de la kunteksto).

Iafoje O-finaĵa participo sen AĴ-sufikso tamen montras nepersonan aferon, kiu plenumas ian funkcion. Tio okazas precipe en matematiko, geometrio k.s.:

- *En la frakcio 5/10 la nombro 5 estas* ***dividato*** *(aŭ numeratoro), kaj la nombro 10 estas* ***dividanto*** *(aŭ denominatoro).*
- *Kiam du fortoj agas sur objekto, la rezulta forto, la* ***rezultanto****, estas la vektora sumo de la originalaj fortoj.*
- *Estas necese, ke ĉiu esperantisto havu la plenan certecon, ke* ***leĝodonanto*** *por li ĉiam estos ne ia persono, sed ia klare difinita verko.* [FAnt.44] La verko *Fundamento de Esperanto* estos donanta la leĝon.

Rimarku, ke en tiaj okazoj ĉiam temas pri **objekto, kiu plenumas funkcion**. Tiu objekto estas prezentata kvazaŭ ĝi estus persono, kvazaŭ ĝi konscie agus aŭ rolus. En aliaj okazoj oni aldonu AĴ: *trovitaĵo* (aŭ simple *trovaĵo*), *dividataĵo*, *dividitaĵo* (aŭ simple *dividaĵo*), *rezultantaĵo*, *rezultintaĵo* (aŭ simple *rezulto*) k.t.p.

Oni uzas iafoje vortojn kiel *estonto*, *estinto*, *pasinto* k.s. por tempoj (= "estonta tempo", "estinta tempo", "pasinta tempo"...). Normale oni uzu la sufikson EC en tiaj vortoj: *estonteco*, *estinteco*, *pasinteco* k.s.: §38.2.8.

## Speciala regulo pri O-finaĵaj participoj

La regulo, ke participo kun O-finaĵo montras la sencan subjekton aŭ objekton de la ago, estas tute speciala regulo. Se tiu regulo ne ekzistus, vorto kiel *mensoginto* signifus pli-malpli "mensoginteco", sed tian signifon *mensoginto* tute ne povas havi.

Sen tiu speciala regulo, oni devus tre ofte aldoni la sufikson UL (§38.2.30) al tiaj O-participoj (kiam temas pri persono): **skribantulo**, **batatulo**, **mortintulo**, **trovitulo**, **alvenontulo**. Sed fakte oni uzas kaj ja devas uzi nur *skribanto*, *batato*, *mortinto*, *trovito*, *alvenonto* k.t.p. La kialo, ke Zamenhof enkondukis tiun regulon pri O-participoj, kredeble estis deziro uzi pli mallongajn vortojn (sen UL-sufikso).

Formoj kiel **skribantulo** do estas eraraj. Ili estas same eraraj kiel ekz. **patrulo** anstataŭ *patro*, aŭ **knabinulo** anstataŭ *knabino*. Se oni celas pli specialajn sencojn, povas tamen esti ĝuste uzi UL en tiaj vortoj. Legu pli pri tio en la klarigoj pri UL: §38.2.30.

## Problemo pri O-finaĵaj participoj

El O-vorto, kiu montras personon, oni normale povas fari A-vorton, kiu signifas "rilata al la persono". Tio tamen ne estas ebla ĉe O-vortaj participoj, ĉar A-participoj havas aliajn signifojn:

- *novulo → novula kurso* = kurso por novuloj
- *komencanto → *komencanta kurso** = kurso por komencantoj

En ĝusta uzo *komencanta kurso* nepre signifas "kurso kiu komencas (ion)". Por esprimi "kurso por komencantoj" oni devas diri ĝuste *kurso por komencantoj* (aŭ eventuale *porkomencanta kurso*).

- *sekretario → sekretaria demando* = demando de sekretario
- *prezidanto → *prezidanta demando** = demando de prezidanto

Sed *prezidanta demando* vere signifas “demando, kiu prezidas”, kvankam tio estas plene absurda signifo.

Rilata problemo aperas iafoje kun priskribo de participo. Se oni ŝanĝas la finaĵojn, oni povas ŝanĝi ankaŭ la signifon de la priskribo:

- *maljuste kondamnita → maljusta kondamnito*. La signifo ŝanĝiĝis. Unue la kondamno estas maljusta. Poste estas maljusta la kondamnita persono. Se MALJUST ankoraŭ priskribu la kondamnon, oni devas diri ekz. *maljuste kondamnita persono*.
- *multe amanta → multaj amantoj*. Unue la amo estas multa. Poste estas multaj la personoj, kiuj amas. Se MULT ankoraŭ priskribu la amon, oni diru ekz. *multamantoj*.
- *malproksime loĝanta → malproksima loĝanto*. Unue iu loĝas malproksime. Poste temas pri malproksima persono, kiu loĝas ie. Se MALPROKSIM ankoraŭ priskribu la loĝadon, oni teorie povas diri ekz. *malproksimloĝanto*, sed prefere oni diru *malproksime loĝanta persono* aŭ *persono, kiu loĝas malproksime*.
- *parolanta la anglan (lingvon) → angla parolanto*. Unue la parolata lingvo estas angla. Poste la persono, kiu parolas, estas angla (kaj eble parolas alian lingvon). Se ANGL ankoraŭ priskribu la paroladon, oni diru ekz. *anglaparolanto*. Sed oni ankaŭ povas uzi *angleparolanto* (el *paroli angle* = “paroli en la angla”).

Iafoje oni vidas provojn elturniĝi per strange uzataj E-finaĵoj: **multe amantoj**, **malproksime loĝanto**, **angle parolanto**. La ideo estas, ke la E-vorto priskribu nur la agan parton de la O-vorto. Tio estas neakceptebla. Se priskribo rilatu al nur parto de vorto, ĝi devas mem fariĝi parto de tiu vorto: *multamantoj*, *malproksimloĝanto*, *angleparolanto* (aŭ *anglaparolanto*). La malĝusta uzo baziĝas sur miskompreno. Oni pensis, ke E-vortoj priskribas agojn, dum A-vortoj priskribas aĵojn. La vera regulo estas, ke E-vortoj priskribas verbojn, dum A-vortoj priskribas O-vortojn. O-vorto povas esti aga, sed ĝi tamen ne estas verbo.

#### *Esperanto*

La vorto *Esperanto* origine estis participo kun la signifo “esperanta persono”. Tiu participo poste fariĝis propra nomo de lingvo, kaj estas tial skribata majuskle. Kiel lingvonomo ĝi tute ne estas plu participo. Oni do povas fari el la lingvonomo la A-vorton *Esperanta* = “rilata al la lingvo Esperanto”. La vorto *esperanto* (kun minusklo) estas tamen ankoraŭ participo, kaj ĝi plu signifas “esperanta persono”. (Multaj skribas ankaŭ la lingvonomon minuskle, kio tamen ne estas rekomendinda, ĉar ĝi estas propra nomo.)

### 28.4. Kunmetitaj verboformoj

Per la helpverbo *esti* kaj diversaj participoj, oni povas esprimi tre ekzakte diversajn nuancojn de modo, tempo, daŭro, plenumiĝo k.t.p. Simplaj verboj (§26) kun AS, IS, OS, US kaj U estas ĝenerale preferindaj, sed en okazoj, kiam oni volas detale prezenti agon, oni povas uzi kunmetitan formon.

Principe oni povas kombini ĉiujn formojn de *esti* (*esti*, *estas*, *estis*, *estos*, *estu*, *estus*) kun ĉiuj ses participoj. Tio donas principe 36 eblajn kunmetitajn verboformojn. Iuj el tiuj formoj estas tamen praktike apenaŭ uzeblaj, ĉar ili esprimas tro strangajn aŭ tro specialajn nuancojn. Aliaj montras nuancojn, kiuj ja estas bezonataj, sed por kiuj ofte ekzistas aliaj pli oportunaj esprimomanieroj.

### 28.4.1. Kunmetitaj verboformoj aktivaj

#### Kunmetitaj ANT-formoj

- *Li **estas leganta** libron.* Lia legado de libro daŭras nun.
- *Li **estis leganta** libron.* Lia legado de libro daŭris tiam.
- *Li **estos leganta** libron.* Lia legado de libro daŭros tiam.
- *Li **estus leganta** libron, se ...* Lia legado de libro daŭrus, se ...
- *Li **estu leganta** libron.* Lia legado de libro daŭru.
- *Li volas **esti leganta** libron.* Li volas, ke lia legado de libro daŭru.
- *Ĝis tiu tago ĉiufoje, kiam ŝi **estis revenanta** hejmen, ŝi ĉiam rapide kuradis sur la ŝtuparo.* [M.192] Ŝi kuradis dum la revenado ankoraŭ daŭris, ne antaŭe, ne poste, sed precize dume.

#### Kunmetitaj INT-formoj

- *Li **estas leginta** libron.* Lia legado de libro estas nun pasinta afero.
- *Li **estis leginta** libron.* Lia legado de libro estis tiam jam pasinta afero.
- *Li **estos leginta** libron.* Lia legado de libro estos en tiu venonta tempo jam pasinta afero.
- *Li **estus leginta** libron, se ...* Lia legado de libro estus pasinta afero, se ...
- *Li **estu leginta** libron.* Lia legado de libro estu pasinta afero.
- *Li volas **esti leginta** libron.* Li volas, ke lia legado de libro estu pasinta afero.
- *La akvo de Nilo **estis retiriĝinta**, la tuta fluejo estis plena de ranoj kaj prezentis por la cikonia familio la plej belan vidaĵon en ĉi tiu lando.* [FA4.29] *= La akvo de Nilo jam antaŭe retiriĝis ...*

#### Kunmetitaj ONT-formoj

- *Li **estas legonta** libron.* Li estas nun preparita por posta (baldaŭa) legado de libro.
- *Li **estis legonta** libron.* Li estis tiam preparita por posta (baldaŭa) legado de libro.
- *Li **estos legonta** libron.* Li estos tiam preparita por posta (baldaŭa) legado de libro.
- *Li **estus legonta** libron, se ...* Li estus preparita por posta (baldaŭa) legado de libro, se ...
- *Li **estu legonta** libron.* Li estu preparita por posta (baldaŭa) legado de libro.

- *Li volas **esti legonta** libron.* Li volas, ke li estu preparita por posta (baldaŭa) legado de libro.
- *Lia bela juna filino, kiu en cigna vesto flugis trans landojn kaj marojn malproksime norden, **estis** neniam **revenonta**. "Ŝi mortis kaj malaperis!"* FA4.30 Ne ekzistis espero, ke ŝi poste revenos.

## Alternativoj al kunmetitaj formoj

La kunmetitaj ANT-formoj tre malofte estas bezonataj. Ili emfaze montras, ke io estas daŭra, kiam io alia okazas:

- *Dum ili **estis irantaj** kaj **parolantaj**, subite aperis fajra ĉaro kaj fajraj ĉevaloj kaj disigis ilin.* Rĝ2.2 La apero de la ĉaro kaj ĉevaloj okazis, kiam ankoraŭ daŭris la irado kaj parolado.

Normale tamen sufiĉas simplaj verboj. Okaze oni povas uzi *(ĝuste) tiam* por akcenti samtempecon:

- *Ni pri tiu sinjoro kaj reganto **revas** ĉiun vesperon, kiam en la ĉielo la luno **lumas** aŭ la steloj **brilas**.* M.2 Ne necesas diri *estas revantaj*, *estas lumantaj* aŭ *estas brilantaj*.
- *Kiam vi telefonis al mi, mi **estis manĝanta**.* Aŭ: *Kiam vi telefonis al mi, **ĝuste tiam** mi manĝis.*

La kunmetitaj INT-formoj estas pli ofte bezonataj. Ili povas esti utilaj por montri, ke ago okazis antaŭ alia. Ofte la kunteksto tamen tion montras sufiĉe bone. Je bezono esprimoj kun *jam*, *antaŭe*, *ĵus*, *post kiam* aŭ *antaŭ ol* povas helpi:

- *Kiam vi vidis nin en la salono, li **jam antaŭe** diris al mi la veron (aŭ li **estis dirinta** al mi la veron).* FE.24
- *Kiam vi venos al mi, li **jam antaŭe** diros al mi la veron (aŭ li **estos dirinta** al mi la veron; aŭ **antaŭ ol** vi venos al mi, li diros al mi la veron).* FE.24
- *Mi ne farus la eraron, se li **antaŭe dirus** al mi la veron (aŭ se li **estus dirinta** al mi la veron).* FE.24
- *Kiam mia patro venos, diru al mi **antaŭe** la veron (aŭ **estu dirinta** al mi la veron).* FE.24
- *Mi volas, ke tio, kion mi diris, estu vera (aŭ mi volas **esti dirinta** la veron).* FE.24
- *Kiam mi venis, li **ĵus** foriris (aŭ **estis foririnta**).*

Oni atentu, ke *jam* ne ĉiam sufiĉas por montri antaŭtempecon: *Ili **jam** manĝis, kiam mi alvenis. = Ili **jam** komencis manĝi (**estis manĝantaj**)...* aŭ *Ili **jam** finis manĝi (**estis manĝintaj**)...* Se *jam* ne estas sufiĉe klara, oni uzu *(jam) antaŭe*.

La finaĵo US (§26.4) estas tempe neŭtrala: ***Estus** pli bone, se mia patrino min ne **naskus**.* H.77 *= ... se mia patrino min ne estus naskinta.* Multaj tamen hezitas uzi simplajn US-verbojn por pasinta tempo, eĉ kiam la kunteksto klare montras la tempon. Ili preferas uzi kunmetitajn formojn kun INT-participo: *Mi **estus leginta** la artikolon hieraŭ, se mi **estus sciinta**, ke ĝi estas tiel*

*bona.* En la frazo ĉeestas la vorto *hieraŭ*, kiu klare montras pasintan tempon. Tial oni povas diri simple: *Mi **legus** la artikolon hieraŭ, se mi **scius**, ke ĝi estas tiel bona.*

La kunmetitaj ONT-formoj estas uzeblaj por montri baldaŭan aŭ intencan agon. Ankaŭ *baldaŭ* kaj diversaj verboj povas tion montri, ofte pli klare:

- *Lia edzino **estas naskonta** infanon.* = *Lia edzino **baldaŭ naskos** infanon.*
- *Ni **estis veturontaj** al la kongreso, sed pro mia malsano devis resti hejme.* = *Ni **intencis (planis, volis, estis pretaj por ...) veturi** al la kongreso ...*
- *En tiu antaŭtagmezo **estis okazonta** la enterigo.* = *En tiu antaŭtagmezo **devis okazi** la enterigo.* [FA3.17]

## 28.4.2. Kunmetitaj verboformoj pasivaj

Por ĉiu el la aktivaj kunmetitaj verboformoj (§28.4.1) ekzistas responda pasiva formo kun simila signifo. Jen kelkaj ekzemploj:

- *La libro **estas legata**.* La legado de la libro daŭras nun.
- *La libro **estis legota**.* La posta (baldaŭa) legado de la libro estis tiam preparita.
- *La libro **estos legata**.* La legado de la libro daŭros tiam.
- *La libro **estus legata**, se ...* La legado de la libro daŭrus, se ...
- *La libro **estu legota**.* La posta (baldaŭa) legado de la libro estu preparita.
- *La libro devas **esti legita**.* Definitiva (tra)legado de la libro estas necesa.

Kiam oni uzas kunmetitajn pasivajn formojn, oni kreas pasivajn frazojn (§29.1).

### Diferencoj inter aktivaj kaj pasivaj participoj

La kunmetitaj IT-formoj iom diferencas de la kunmetitaj INT-formoj. Kunmetita INT-formo ĉiam montras agon, kiu okazis antaŭ alia ago. Kunmetita IT-formo montras plenumiĝon de ago, aŭ agon, kiu donis rezulton. IT-formo ja povas montri tempon pli fruan ol alia, sed tre ofte ne estas tiel:

- *Tiam li **estis eltrovinta** la veron.* La eltrovo de la vero okazis nepre antaŭ tiam.
- *Tiam la vero **estis eltrovita**.* La eltrovo de la vero plenumiĝis ĝuste tiam, aŭ antaŭ tiam, laŭ la kunteksto.
- *Mia onklo ne **mortis** per natura morto, sed li tamen ne **mortigis** sin mem kaj ankaŭ **estis mortigita** de neniu; unu tagon, promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj **mortiĝis**.* [FE.39] Ĉiuj formoj de la verbo *morti* montras ĉi tie la saman agon (kaj do kompreneble ankaŭ la saman tempon). La formo *estis mortigita* ne montras tempon pli fruan. Sed se *estis mortiginta* aperus en la frazo, ĝi nepre montrus tempon pli fruan.

Tiu ĉi malsimetrio inter aktivaj kaj pasivaj formoj ĝenas kelkajn esperantistojn. Ili volas krei plenan simetrion. Tia (reforma) lingvouzo nomiĝas

**atismo**. En la atismo la malsimetrio tamen ne malaperis, sed nur moviĝis de la IT-formoj al la AT-formoj. En atisma lingvouzo la AT-formoj ne estas simetriaj kun la ANT-formoj.

ANT-formo ĉiam montras, ke ago estas daŭranta, nefinita aŭ ripeta. AT-formo en normala Esperanto montras precize la saman nuancon:

- *Hieraŭ ili **estis trovantaj** la perditajn aferojn.* La trovado de la aferoj hieraŭ daŭradis iom post iom aŭ ripete. Verŝajne oni ne finis la trovadon hieraŭ. Alie oni ne uzus *estis trovantaj*, sed simple *trovis*.
- *Hieraŭ la perditaj aferoj **estis trovataj**.* La trovado de la aferoj hieraŭ daŭradis iom post iom aŭ ripete. Eventuala fino de la trovado ne estas montrata. Verŝajne oni ne finis la trovadon hieraŭ. Alie oni dirus *estis trovitaj*. La AT-formo donas precize la saman nuancon kiel la ANT-formo.

En atisma lingvouzo tamen la pasiva frazo kun *estis trovataj* ricevas alian signifon: "La trovado de la aferoj okazis hieraŭ, verŝajne ĝisfine." La AT-formo do ne donas la saman nuancon kiel la ANT-formo. La AT-formoj perdis sian daŭran signifonuancon, kaj tio donas novan malsimetrion. Ekzistas tamen ekstremaj atistoj, kiuj por ripari la malsimetrion en la atismo volas nuligi la daŭran sencon ankaŭ de la ANT-formoj. Estas iom neklare, kian uzon ili tiam trovas por la ANT-formoj. Sed efektive tio estas nur teoria afero, ĉar en la praktiko ankaŭ atistoj uzas la ANT-formojn por montri daŭradon aŭ ripetadon. Legu pli pri atismo en §29.2.3.

### Pliklarigaj esprimoj ĉe IT-formoj

Iafoje povus estiĝi miskompreno, ĉu IT-formo montras agon pli fruan, aŭ agon kiu plenumiĝis. Tiam oni helpu sin per aldonaj esprimoj, kiuj klare montras la tempon. En la praktiko tamen tiaj klarigoj estas malofte bezonataj:

- *Kiam via domo estis konstruata, mia domo estis **jam longe** konstruita.* [FE.25] *Estis konstruita* estas antaŭtempa kompare kun *estis konstruata*.
- *"Jes, sed **antaŭe** ni iradis en la lernejon kaj iom lernis,"* [...] *"kaj **poste** ni estis konfirmitaj."* [FA2.78] *Estis konfirmitaj* estas posttempa kompare kun *iradis* kaj *lernis*.
- *La botelkolo venis supren, estis provizita per korko, kaj tiu ĝia parto, kiu **antaŭe** estis turnita supren, **nun** estis turnita malsupren.* [FA3.113] *Estis turnita supren* montras tempon pli fruan ol *estis turnita malsupren*.
- *Ŝi sidiĝis sur la seĝo, kiu **antaŭ momento** estis donita al ŝi.* [M.44] Sen *antaŭ momento* oni supozus, ke la sidiĝo estis pli-malpli samtempa kiel la donado, sed efektive pasis momento inter la du agoj.

## Alternativoj al kunmetitaj pasivaj formoj

Oni ne povas eviti kunmetitajn pasivajn formojn en tiuj manieroj, kiuj estis ĉi-antaŭe montritaj por la aktivaj formoj (§28.4.1), ĉar simplaj pasivaj verboformoj ne ekzistas. Unu maniero ilin eviti estas tamen revortigi la frazon en aktiva formo. Anstataŭ *li estis mortigita de neniu* oni povas diri

*mortigis lin neniu*. Anstataŭ *la domo estas baldaŭ vendota* oni povas diri *oni baldaŭ vendos la domon*. Tre ofte povas esti rekomendinde elekti aktivan formon, ĉar aktivo ordinare estas pli simpla kaj pli rekta. Iaj IĜ-verboj similas al simplaj pasivaj verboj (§38.2.18), kaj ili povas iafoje esti taŭga alternativo.

### 28.4.3. Nekutimaj kunmetitaj verboj

#### Trioble kunmetitaj verboj

Teorie oni povus montri eĉ pli specialajn nuancojn per trioble (eble eĉ pluroble) kunmetitaj formoj. En la praktiko tio tamen ne okazas, ĉar tiaj formoj estas tro malfacilaj:

- *Kiam li alvenis, mi* ***estis estinta leganta*** *la libron dum kelka tempo.* ≈ *Kiam li alvenis, mi estis leginta la libron dum kelka tempo.* Ambaŭ formoj montras, ke la legado okazis antaŭ la alveno. La nekutima triobla formo precizigas, ke la legado estis daŭra, kaj ke ĝi ne ĉesis ĝuste kiam li alvenis, sed ke ĝi ĉesis jam antaŭe. Se iam vere estas necese esprimi ion tian, oni faru tion en pli klara maniero, ekz.: *Mi leg(ad)is la libron dum kelka tempo, sed kiam li alvenis, mi estis ĉesinta legi.* Aŭ *... mi jam antaŭe ĉesis legi.*

#### Mallongigitaj kunmetitaj verboj

Iafoje anstataŭ uzi *esti* + participon, oni rekte verbigas la participon, same kiel oni ofte rekte verbigas aliajn A-vortojn.

**Aktivaj formoj**

| **Normale** | **Mallongigite** |
|---|---|
| *estas leganta* | *legantas* |
| *estis legonta* | *legontis* |
| *estos leginta* | *legintos* |
| *estus leginta* | *legintus* |
| k.t.p. | |

**Pasivaj formoj**

| **Normale** | **Mallongigite** |
|---|---|
| *estas legata* | *legatas* |
| *estis legota* | *legotis* |
| *estos legita* | *legitos* |
| *estus legita* | *legitus* |
| k.t.p. | |

Zamenhof neniam uzis tiajn mallongigitajn formojn, sed ili estas tute logikaj. Bedaŭrinde ili estas en la praktiko tre malfacile kompreneblaj. Vorto kiel *legintos* enhavas ŝajne tro multe da informoj en tro kompakta formo. La

normalaj kunmetitaj formoj kun *esti* estas pli taŭgaj en tiuj maloftaj okazoj, kiam oni ne povas uzi ordinarajn simplajn verboformojn (*legis*, *legos* k.t.p.).

Sed kelkaj tiaj mallongigitaj formoj efektive praktike iom enuziĝis. Precipe INTUS-formoj estas popularaj. Simpla US-formo estas tute sentempa, sed multaj tamen sentas US-verbojn kiel nuntempajn, kaj uzas INTUS ĉiam, kiam temas pri pasinteco:

- *Se mi **sciintus** tion, mi **agintus** alie. = Se mi **estus sciinta** tion, mi **estus aginta** alie.* Oni povas pli simple diri: *Se mi (tiam antaŭe) **scius** tion, mi (tiam) **agus** alie.*

Ankaŭ ATAS-formoj estas sufiĉe oftaj:

- ***Bezonatas** novaj fortoj en nia organizo. = Estas bezonataj ...*
- ***Serĉatas** nova redaktisto por la revuo. = Estas serĉata ...*

# 29. Pasivo

## 29.1. Pasivo — bazaj reguloj

Frazojn kun objekta verbo oni povas transformi de aktivo (normala frazo) en pasivon. Pasivo estas kvazaŭ inversa maniero prezenti agon. Kiam oni pasivigas frazon, okazas tri ŝanĝoj:

- La objekto fariĝas subjekto (kaj perdas sian N-finaĵon).
- La ĉefverbo fariĝas kunmetita verbo: *esti* + pasiva participo.
- La aktiva subjekto malaperas aŭ fariĝas *de*-komplemento.

*La knabino vidas la domon.*

- *la domon → la domo*
- *vidas → estas vidata*
- *la knabino → de la knabino*

*→ La domo estas vidata de la knabino.*

*Li batis sian hundon per bastono.*

- *sian hundon → lia hundo*
- *batis → estis batata*
- *li* povas malaperi

*→ Lia hundo estis batata per bastono.*

En la lasta ekzemplo *sia* fariĝas *lia*, ĉar la subjekto ŝanĝiĝis. Legu aparte pri la reguloj de *si* en §11.6.1.

Oni uzas pasivon por movi la atenton for de la aktiva subjekto al la ago. Ankaŭ la iama objekto (la nova subjekto) ricevas pli da atento. Oni ofte uzas pasivon, kiam oni parolas pri tre ĝenerala afero, kiam apenaŭ ekzistas aktiva subjekto:

- *Mi ĉiam volonte aĉetas tiun ĉi komercaĵon. → Tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte aĉetata de mi.* [FE.25]
- *Iu lavos vin. → Vi estos lavita.* [FE.25]
- *Estu trankvila, mi pagos mian tutan ŝuldon al vi baldaŭ. → Estu trankvila, mia tuta ŝuldo estos pagita al vi baldaŭ.* [FE.25]
- *Oni ne serĉus nun tiel longe mian oran ringon, se vi ne estus kaŝinta ĝin tiel lerte. → Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata, se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi.* [FE.25]

### Pasivo kun E-finaĵo

Se la pasiva subjekto estas subfrazo, la pasiva participo devas havi E-finaĵon. Tiaj pasivigoj okazas normale nur, se la aktiva subjekto estas *oni*:

- *Oni nun interkonsentis, <u>ke Johano en la sekvanta mateno denove venos en la palacon</u>. → Estis nun **interkonsentite**, ke Johano en la sekvanta mateno denove venos en la palacon.* [FA1.72]

Oni devas uzi E-participon ankaŭ kiam la pasiva subjekto estas I-verbo:

- *Oni ordonis al la lernoknabo de la peltisto alporti botelon da vino. → Al la lernoknabo de la peltisto estis* ***ordonite*** *alporti botelon da vino.* [FA3.107] Senca subjekto de *alporti* estas *la lernoknabo*. Subjekto de *ordonis* estas *oni*.
- *Ĉu oni permesas (al mi) demandi, kun kiu mi havas la plezuron paroli? → Ĉu estas* ***permesate*** *demandi, kun kiu mi havas la plezuron paroli?* [FA1.120]

Oni uzas E-participon ankaŭ kiam la pasiva subjekto estas kvanta E-vorto aŭ kvanta E-vorteca vorteto:

- *Kiom multe povas enhavi en si unu ĝemo, aŭ kiom multe oni povas atribui al ĝi! → Kiom multe povas enhavi en si unu ĝemo, aŭ kiom multe povas esti* ***atribuate*** *al ĝi!* [FA4.149] *Multe* estas objekto de la aktiva verbo *atribui*, kaj fariĝas subjekto de la pasiva verbo *esti atribuate*.

Iafoje objekta verbo aperas en frazo sen objekto. Se oni pasivigas tian frazon, la rezulto estas sensubjekta pasiva frazo. La participo tiam havu E-finaĵon. Tiaj pasivigoj okazas normale nur se la aktiva subjekto estas *oni*:

- *La pastro liberigos lin de la peko, kiun li pekis, kaj oni pardonos al li. → La pastro liberigos lin de la peko, kiun li pekis, kaj estos* ***pardonite*** *al li.* [Lv.4]
- *La malgranda knabino ellernis kanton, en kiu oni ankaŭ parolis pri rozoj. → La malgranda knabino ellernis kanton, en kiu ankaŭ estis* ***parolate*** *pri rozoj.* [FA2.52] La objekta verbo *parolis* ne havas objekton. Sekve la pasiva frazo ne havas subjekton.
- *Ĉu ne tiel oni skribis en la Korano? → Ĉu ne tiel estas* ***skribite*** *en la Korano?* [FA4.225]

Se ĉeestas la pasiva subjekto (la objekto de la responda aktiva frazo), kaj se ĝi estas O-vorto aŭ O-vorteca vorteto, oni nepre devas uzi A-finaĵon ĉe la participo: *Lia peko estos* ***pardonita*** *al li. Vortoj estis* ***parolataj*** *pri rozoj. Tio estas* ***skribita*** *en la Korano.*

## La vera aganto

Se oni volas konservi en pasiva frazo la originan subjekton de la aktivo, oni devas uzi la rolvorteton *de* (§12.3.2.4):

- *Ĝi estis trovita* ***de mia frato***. *= Mia frato trovis ĝin.*
- *La piano estas ludata* ***de vera majstro***. *= Vera majstro ludas la pianon.*

La rolvorteto *de* havas multajn signifojn, sed ĉe pasiva participo ĝi preskaŭ ĉiam montras aganton. Se tamen estas risko de miskompreno oni povas uzi *fare de* (§12.3.2.2): *Ĝi estis forprenita* ***fare de mi***. *= Mi forprenis ĝin.*

Iafoje ĉe pasivaj verboj de scio kaj kono oni montras la aganton per *al* (§12.3.5.1).

### Alternativoj al pasivo

En la parola lingvo pasivo estas malofta. Legu pri alternativoj al pasivaj formoj en §28.4.2.

## 29.2. Pasivo — participelekto

Iafoje oni povas heziti, kiun participon elekti en pasivaj frazoj.

### 29.2.1. Elekto de pasiva participo — bazaj principoj

La elekto de participo en pasivo dependas simple de tio, kion oni volas esprimi. Oni elektu AT-participon, se oni interesiĝas pri la iom-post-ioma daŭrado de la ago, aŭ se temas pri ripetado de la ago. Oni elektu IT-participon, se plenumiĝo aŭ rezulto estas pli grava. Oni elektu OT-participon, se temas pri stato antaŭ la ago.

| | |
|---|---|
| **AT** | daŭrado aŭ ripetado |
| **IT** | plenumiĝo aŭ rezulto |
| **OT** | stato antaŭ ago |

### Kontrolesprimoj

Kiam oni hezitas inter AT kaj IT, oni povas uzi kontrolesprimojn por trovi, kiu nuanco pli taŭgas.

Se oni povas aldoni ***iom post iom***, ***plu kaj plu*** aŭ ***ree kaj ree*** sen tute ŝanĝi la sencon, tiam taŭgas AT, ĉar *iom post iom* kaj *plu kaj plu* emfazas daŭradon, kaj *ree kaj ree* emfazas ripetadon:

- *Ŝi amis kaj estis* [plu kaj plu] ***amata**.* [M.14]
- *Dum la kafo estis* [iom post iom] ***kuirata**, ŝi sidiĝis sur seĝo kaj endormiĝis.* [FA4.114]
- *Tiu ĉi komercaĵo estas ĉiam volonte* [ree kaj ree] ***aĉetata** de mi.* [FE.25]
- *Mi sciigas, ke de nun la ŝuldoj de mia filo ne estos* [ree kaj ree] ***pagataj** de mi.* [FE.25]

Se oni povas aldoni ***definitive*** sen detrui la sencon, tiam taŭgas IT, ĉar *definitive* akcentas plenumiĝon aŭ atingon de rezulto:

- *Georgo Vaŝington estis* [definitive] ***naskita** la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua.* [FE.12]
- *La surtuto estas* [definitive] ***aĉetita** de mi, sekve ĝi apartenas al mi.* [FE.25]
- *Estu trankvila, mia tuta ŝuldo estos* [definitive] ***pagita** al vi baldaŭ.* [FE.25]
- *Kiam estis* [definitive] ***aŭdigita** la ordono de la reĝo kaj lia leĝo* [...], *tiam ankaŭ Ester estis* [definitive] ***prenita** en la reĝan domon*[...]. [Es.2]

### 29.2.2. Elekto de pasiva participo — specialaj okazoj

La bazaj principoj por participelekto (§29.2.1) sufiĉas por plene ĝuste esprimi sin, sed tamen estas eble aldoni ankoraŭ kelkajn specialajn nuancajn principojn.

#### Dusignifaj verboj

Iuj verboj havas du malsamajn signifojn, kaj la elekto de participo dependas de tio, kiu el la du signifoj estas celata.

Klasika ekzemplo estas la verbo *okupi*, kiu povas signifi aŭ "preni okupe" aŭ "teni okupe". Prenado estas ago normale momenta, kaj tial precipe la plenumiĝo estas interesa. Tenado tamen estas pli longdaŭra afero, kaj tial normale la daŭrado estas pli interesa. Post prenado tamen sekvas tenado, kaj antaŭ tenado normale okazas prenado. Tial ĉe *okupi* oni ofte povas uzi AT-formon aŭ IT-formon laŭplaĉe sen praktika diferenco:

- *Mi estas tre **okupata** de mia laboro. = Mia laboro nun "tenas min" (plu kaj plu), ĉar ĝi antaŭe "prenis min".*
- *Mi estas tre **okupita** de mia laboro. = Mia laboro (definitive) "prenis min", kaj tial ĝi nun "tenas min".*

Alia ekzemplo estas *kovri*, kiu havas du signifojn depende de tio, ĉu la aktiva subjekto estas la kaŭzanto de la kovrado, aŭ la afero, kiu troviĝas en kovra pozicio:

- *Li kovris la plankon per tapiŝo. → La planko estis **kovrita** (de li) per tapiŝo.* Ĉi tie temas pri la definitiva rezulto de la ago "meti sur plankon".
- *Tapiŝo kovris la plankon. → La planko estis **kovrata** de tapiŝo.* Ĉi tie temas pri iom-post-ioma daŭrado de la ago "kuŝi sur planko".

Plej ofte oni uzas IT-formon ĉe verboj kiel *okupi* kaj *kovri*, sed oni havas liberan elekton depende de la ideo, kiun oni volas esprimi.

#### Teoria eblo de plenumiĝo

Zamenhof ofte preferis AT-formon en frazoj, kie la ago estas nur teoria eblo, kiu ne certe efektiviĝos. Li ankaŭ preferis AT en frazoj, kie la ago estas neata, kaj en aliaj frazoj, kie la kunteksto iel forviŝas la ideon de plenumiĝo:

- *Kiam fariĝis mallume kaj la ĝardeno devis esti **ŝlosfermata**, la pordisto lin forpelis.* [FA1.212] Verŝajne poste la ĝardeno estis efektive ŝlosfermita, sed la frazo ne celas rakonti pri tio. Kiam la forpelado okazis, la ŝlosfermado estis ankoraŭ nur dezirata.
- *Ĉi tiu verko devas esti **eldonata** nun aŭ neniam.* [M.133] Temas pri devo de eldonado, ĉefe pri la komencado de la eldonlaboroj. Ĉu la eldonado plenumiĝos, oni ne scias.
- *Ili volas, ke tia aŭ alia ŝanĝo estu **farata** jam nun.* [OV.59] Ĉu la ŝanĝoj estos plenumitaj, oni ne scias.
- *La unueco de Esperanto neniam estos **rompata**.* [FAnt.48] La rompo neniam plenumiĝos.

- *Eĉ vulpo plej ruza fine estas **kaptata**.* PE.285 Temas pri principo ĉiam valida. La ideo de daŭreco fariĝas do pli grava ol la ideo de plenumiĝo.

Sed oni ankaŭ povas uzi IT-formon en ĉi tiaj frazoj. Oni havas liberan elekton laŭ tiu nuanco, kiun oni volas esprimi. Efektive oni trovas ĉe Zamenhof ankaŭ IT-participojn en tiaspecaj frazoj:

- *La artikoloj devas ĉiam esti **subskribitaj** per plena nomo kaj adreso.* OV.98
- *Tiu ĉi traduko, pro manko de mono, bedaŭrinde ĝis nun ne povis esti **eldonita**.* OV.220

### Ripetoj

Ĉe ripetaj agoj oni normale uzas AT, ĉar oni interesiĝas pri la ripetado, sed iafoje oni povas koncentriĝi je la plenumiĝo de ĉiu unuopa ripeto, kaj uzi IT. Se oni montras la precizan nombron de ripetoj, la ideo de plenumiĝo fariĝas pli grava, kaj oni tiam ordinare uzas IT-formon:

- *Dum la milito tiu vilaĝo estis ofte **prirabata** kaj **bruligata**.*
- *Dum la milito tiu vilaĝo estis kvarfoje **prirabita** kaj **bruligita**.*
- *Unu velo post la alia estis **levataj**.* FA1.88 Zamenhof pensis pri la tuto: pluraj veloj estis iom post iom levataj.
- *Unu velo post la alia estis **levita**.* Ĉi tie oni parolas pri ĉiu unuopa definitiva levo de velo.

### 29.2.3. Atismo

Iuj esperantistoj ne akceptas tiujn principojn pri elektado de AT kaj IT (§29.2.1), kiuj estas klarigitaj ĉi-antaŭe. Laŭ tiuj esperantistoj AT signifu anstataŭe "ĝuste tiam", kaj IT signifu laŭ ili nur "antaŭ tiam". Ili uzas frazojn kiel: **Mi estis naskata en Januaro.** **La ŝlosilo estis perdata hieraŭ.** **Subite li estis trafata de kuglo.** Tian lingvaĵon oni kutime nomas "atismo" (ankaŭ "tempismo"). En normala Esperanto oni uzas IT en tiaj frazoj, kaj tial oni ofte uzas la esprimon "itismo" (ankaŭ "aspektismo").

Pri la ĝusta maniero uzi AT kaj IT en pasivaj frazoj okazis multege da diskutoj. En 1967 la Akademio de Esperanto faris oficialan decidon (*Aktoj de la Akademio*, p. 74) por itisma uzado. En 1989 la Akademio faris rezolucion por la itismo kaj kontraŭ la atismo (*Aktoj de la Akademio III*, p. 75). La reguloj pri pasivo prezentataj en *PMEG*, estas konformaj al tiuj Akademiaj decidoj, al la uzado en la *Fundamento*, kaj al la maniero, en kiu Zamenhof uzis pasivajn participojn en sia tuta verkaro.

La demandon pri itismo kaj atismo definitive decidas tri modelaj frazoj en la *Fundamento*:

- *Georgo Vaŝington **estis naskita** la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua.* FE.12
- *Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li **estis naskita**.* FE.33

- *Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ **estis mortigita** de neniu; unu tagon, promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj mortiĝis.* [FE.39]

La *Fundamento* estas la baza leĝo de Esperanto. Ĝiajn ekzemplojn oni rigardu kiel modelojn de ĝusta Esperanto, kaj ne kiel forklarigendajn problemojn.

Atistoj kritikas la zamenhofan uzadon, ĉar la IT-formoj ne ĉiam montras la saman nuancon kiel la INT-formoj. Ili pravas, aktivo kaj pasivo efektive estas malsimetriaj. Sed la atismo estas same malsimetria pri AT kaj ANT (§28.4.2).

## 29.3. Pasivigeblaj frazoj

Nur objektaj verboj povas pasiviĝi. Ĉu verbo estas objekta aŭ ne, estas ĉefe afero de signifo. Kelkaj verboj havas tian signifon, ke povas aperi objekto (§30.3), dum aliaj verboj ne havas tian signifon:

- *La knabo **batas** ŝtonon. → La ŝtono **estas batata** de la knabo. Bati* estas objekta verbo. Tial oni povas ĝin pasivigi.
- *La knabo **staras** sur la korto. Stari* ne povas havi objekton. Pasivigo de la frazo do ne estas ebla.

Iafoje pro nacilingva influo povas aperi pasivigo de tute senobjekta verbo. Tiaj frazoj estas evitendaj, ĉar ili kontraŭas al la plej baza principo de pasivo:

- *"Mi krakas por ĉiuj!" asertis la krakpizo. "Ĉu por junuloj, ĉu por maljunuloj, ĉiam do ***estas krakate***!" diris la kraĉujo.* [FA3.85] *Kraki* neniam povas havi objekton. La frazo estas do malbona, kvankam zamenhofa. Oni diru *... ĉiam oni do krakas ... ... ĉiam vi do krakas ...* aŭ simile.

Pasivigo tamen iafoje estas ebla ĉe verboj, kiuj estas objektaj, sed kies objekto ne ĉeestas en la frazo (§29.1).

### Pasivigo de I-verboj

I-verbo povas havi objekton, ekz. *ami virinon*, kaj I-verbo povas havi pasivan formon, ekz. *esti amata*. Sed I-verbo ne povas havi propran subjekton. La senca subjekto de tia pasivigita I-verbo devas esti subkomprenata:

- *"Deŝiru la floron!" diris la alia knabo, kaj la lekanto forte ektremis pro timo, ĉar **esti deŝirita** signifis ja perdi la vivon.* [FA1.150] La subkomprenata senca subjekto de *esti deŝirita*, estas ĉio ajn, kion oni deŝiras.

Se I-verbo aperas kune kun ĉefverbo, ekz. *volas deŝiri*, *povas bati*, *devas manĝi*, *planas viziti*, oni iafoje tamen povas pasivigi la I-verbon sen tute forigi ĝian objekton. Tio estas ebla, se la objekto povas laŭsence fariĝi subjekto de la ĉefverbo:

- *La knabo **devas bati** la ŝtonon. → La ŝtono **devas esti batata** de la knabo.* Ĉi tiu pasivigo estas ebla, ĉar la ŝtono povas esti subjekto de *devas*. La signifo iomete ŝanĝiĝas: la devo transiras de la knabo al la ŝtono, sed tio praktike ne faras diferencon.

- *La knabo **povas bati** la ŝtonon.* → *La ŝtono **povas esti batata** de la knabo.* La ŝtono fariĝas subjekto de *povas*. Tio iom ŝanĝas la signifon: la povo transiras de la knabo al la ŝtono. En la aktiva frazo povas temi pri kapablo de la knabo. En la pasiva frazo temas pri eblo.

Sed en la sekvaj ekzemploj tia pasivigo ne estas ebla, ĉar la rezultanta pasiva frazo ricevas tute malĝustan signifon:

- *La knabo **volas bati** la ŝtonon.* → **La ŝtono **volas esti batata** de la knabo.** La ŝtono ja ne volas ion ajn.
- *Mi **planis inviti** ilin al la festo.* → **Ili **planis esti invititaj** al la festo.** Ili nenion planis.

### I-verboj kiel objektoj

I-verbo povas roli kiel objekto de ĉefverbo, kaj tiajn frazojn oni povas pasivigi. Tiam la I-verbo (kune kun ĉiuj frazpartoj, kiuj apartenas al ĝi) fariĝas subjekto de la pasiva frazo, kaj la pasiva participo ricevas E-finaĵon (§29.1):

- *Oni proponis al la knabo **bati la ŝtonon**.* → *Al la knabo estis proponite **bati la ŝtonon**. Bati la ŝtonon* rolas kiel objekto de *proponis*, kaj poste kiel subjekto de *estis proponite*.

Rimarku en la ĉi-antaŭa ekzemplo, ke la senca subjekto de la I-verbo *bati* (*la knabo*), kaj la subjekto de la ĉefverbo *proponis* (*oni*) ne estas samaj. Se la senca subjekto de tia I-verbo estas la subjekto de la ĉefverbo, oni ĝenerale tute malemas pasivigi:

- *Mi povas **kuri**.* → ****Kuri** estas povate de mi.* Kuri* kaj *povas* havas la saman subjekton.
- *Li finis **paroli**.* → ****Paroli** estis finite de li.* Paroli* kaj *finis* havas la saman subjekton.

Iuj verboj ĉiam havas samsubjektan I-verbon kiel objekton, ekz. *povi*, *devi* kaj *kuraĝi*. Tiajn verbojn oni do praktike neniam pasivigas, kaj pasivaj participoj de tiaj verboj estas do praktike tute neuzataj. Oni ankaŭ ne uzas la sufiksojn EBL (§38.2.7), IND (§38.2.21) kaj END (§38.2.12) ĉe tiaj verboj, ĉar tiuj sufiksoj ĉiam donas pasivan signifon. Oni do neniam uzas **povata**, **devote**, **kuraĝita**, **poveble**, **kuraĝenda** k.s.

Ĉe *povi* kaj *devi* oni uzas anstataŭe esprimojn kun *esti eble*, *ebli* kaj *esti necese*, *necesi*: *Alie agi estis absolute ne eble.* [OV.182] *Por la lernado de ambaŭ estas necese pagi.* [M.101] *Ĉu estas eble ricevi ion por manĝi ĉi tie? Necesas atendi dum kelkaj minutoj.*

## Pasivigo de aliaj frazroloj

Aliaj frazpartoj ol objekto (ekz. *al*-komplemento) ne povas fariĝi subjekto de pasiva frazo:

- *Oni donis **al mi** trinkaĵon.* → ****Mi** estis donita trinkaĵon.** Tia pasiva frazo estas klara eraro, ĉar la pasiva verbo havas objekton: *trinkaĵon*. Pasiva verbo ne povas havi objekton.
- *Mi sendos **venigi kuracistojn**.* [Rt.124] → ****Venigi kuracistojn** estos sendite (de mi).* Venigi* estas ĉi tie ne objekto, sed *por*-komplemento: *Mi sendos*

*(iun)* ***por venigi kuracistojn***. La vera objekto de *sendi* estas subkomprenata *iu*. Ĝusta pasiviĝo do estas: *Iu estos (de mi) sendita venigi kuracistojn.*

Kiam iafoje neobjekta komplemento aperas kiel subjekto de pasiva frazo, la klarigo estas, ke ĝi povus esti vera objekto:

- *Dolĉa estos nia rekompenco, kiam* ***la celo*** *estos alvenita.* [OV.591] Normale oni dirus aktive: *... kiam ni alvenos* ***al la celo***. Ŝajnas do, ke Zamenhof erare pasivigis *al*-komplementon. Sed fakte oni ankaŭ povus diri: *... kiam ni alvenos* ***la celon***. Tio estas pli malofta dirmaniero, sed regula. Tial la pasiva frazo estas bona.
- ***Tiu ĉi urbo*** *estas dense loĝata.* Normale oni dirus aktive: *Oni loĝas dense* ***en tiu ĉi urbo***. Sed oni ankaŭ povas diri: *Oni loĝas dense* ***tiun ĉi urbon***.

# 30. Verboj kaj frazroloj

La plej grava parto de frazo estas la ĉefverbo. Ĝi regas la gramatikon de la tuta frazo. Ĉefverbo estas kvazaŭ manuskripto de teatraĵo. Ĝi decidas, kiaj rolantoj povas aperi, kaj kiajn rolmontrilojn ili havu. Por konstrui frazojn ĝuste oni do devas por ĉiu verbo scii, kiaj rolantoj povas aŭ devas aperi. Plej grave estas scii detalojn pri **subjekto**, **objekto** kaj **perverba priskribo**. Tiujn rolojn oni povas nomi ĉefaj frazroloj. Ĉe iaj verboj ankaŭ *al*-komplemento estas grava frazrolo. Aliaj komplementoj (tempaj, lokaj, manieraj ...) kondutas pli libere. Tiajn povas havi pli-malpli ĉiu verbo.

Ĉi tie aperos nur ekzemploj de diversaj specoj de verboj, kaj ne ĉiuj detaloj estos klarigitaj. Multaj verboj havas plurajn signifojn, kaj la reguloj por frazroloj povas esti malsamaj por la diversaj signifoj. Bonaj vortaroj donas pli da informoj, almenaŭ per ekzemplaj frazoj.

La ĉi-postaj klarigoj traktos ĉefe aktivajn frazojn. Tio estas la normala maniero montri agon. Frazojn kun objekto oni povas transformi en pasivon (§29). Tiam la frazroloj ŝanĝiĝas.

## 30.1. Sensubjektaj verboj

La granda plejmulto de la Esperantaj verboj devas havi subjekton (§12.1.1), sed kelkaj verboj ne bezonas tian rolanton. Ili estas, aŭ povas esti, sensubjektaj. Sensubjektaj verboj estas normale ankaŭ senobjektaj.

***tagiĝi*** Sola *tagiĝas* (aŭ alia ĉefverba formo) sufiĉas por fari kompletan frazon: *Tagiĝis.* / *Baldaŭ tagiĝos.*

***temi*** *Temi* ne bezonas subjekton, sed havas normale *pri*-komplementon, kiu montras la temon: *Temas **pri politiko**.* / *Verŝajne temos **pri ni**.* Tio, kio havas temon, povas tamen aperi kiel subjekto: ***La kunveno** temis pri la milito.* / ***Mia prelego** temos pri Zamenhof.* / ***PMEG** temas pri Esperanta gramatiko.*

***pluvi*** *Pluvis hieraŭ.* / *Baldaŭ pluvos.* / *Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas senĉese, senfine, senhalte.* [OV.591] Se io alia ol pluvakvo falas pluvsimile, tio aperas kiel subjekto: ***Ĉiuspecaj demandoj** pluvis sur ŝin.* / *Pluvis **ŝtonoj** sur ilin.* (Atentu, ke la falaĵo estas subjekto, ne objekto. Sekve ne diru: **Pluvis ŝtonojn sur ilin.**) Ĝenerale ĉiuj similaj veterverboj estas sensubjekte uzeblaj: *neĝi*, *hajli*, *ŝtormi*, *frosti*, *fulmi*, *tondri* k.a.

Ankaŭ priskribaj verboj, kiel *esti* kaj *fariĝi* povas esti sensubjektaj (§30.5).

## 30.2. Senobjektaj verboj

Plej multaj verboj devas havi subjekton (§12.1.1), sed multaj el ili ne povas havi objekton (§12.2.2). Ili estas senobjektaj verboj. Kelkaj tiaj verboj povas tamen iafoje havi objekton, kiu pliklarigas la agon.

***okazi*** La subjekto estas ago aŭ simila afero. Objekto ne povas aperi: *En Kjöge ĉiujare okazadis **tre vizitata foiro**.* [FA3.56] / ***Kio** okazis?* / *Okazis **io grava**.* Tio, kio spertas la okazaĵon povas aperi kiel *al*-komplemento: *La malfeliĉa infano rakontis al ŝi naive ĉion, kio okazis **al ŝi**.* [FE.17]

***ĝoji*** La subjekto estas tiu, kiu sentas ĝojon, do normale persono. Krome *ĝoji* havas ofte *pri*-komplementon aŭ *pro*-komplementon, kiu montras la temon aŭ la kaŭzon de la ĝojo: ***Mi** tre ĝojas pri via feliĉo!* [FA2.137] / ***Naskinto de saĝulo** ĝojos pro li.* [SS.23]

***morti*** La subjekto estas tiu, kiu perdas sian vivon: *Dume en la domo de la malgranda Niko mortis **lia maljuna avino**.* [FA1.20] / *Ĉiun fojon, kiam mortas **bona infano**, anĝelo de Dio malleviĝas sur la teron.* [FA2.21] Iafoje la speco de morto aperas kiel objekto: *La herooj mortis **gloran morton**.*

***danci*** La subjekto estas tiu, kiu sin movas dance: ***La gejunuloj** kune dancis ĝis malfrua nokto.* / *En la aero dancis **sennombraj kuloj**.* [FA4.44] Iafoje la dancospeco aperas kiel objekto: *Mi dancis **valson** kun li.* / *La maristoj dancis **gajajn dancojn** sur la ferdeko.* [FA1.102]

## 30.3. Objektaj verboj

Multaj subjektaj verboj povas krom subjekto (§12.1.1) havi ankaŭ objekton (§12.2.2). Ili estas objektaj verboj.

***vidi*** La subjekto estas tiu, kiu perokule rimarkas ion. La objekto estas tio, kio estas rimarkata: *La knabino vidas **la domon**.* / *Ĉu vi vidis **la akcidenton**?*

***preni*** La subjekto estas tiu, kiu kaŭzas la agon kaj ekhavas la objekton. La objekto estas tio, kio pro la preno transiras al la subjekto: *Ŝi prenis el la ŝranko **la argilan kruĉon**.* [M.13] / *Ili prenis **la soldaton** kaj ĵetis lin en malliberejon.* [FA1.11] Se oni volas precize diri, kiu parto de la objekto estas trafata de la preno, oni uzas *je*-komplementon: *Poste ŝi prenis Gerdan **je la mano**.* [FA2.57] (La mano apartenas al Gerda.) La korpoparto aŭ ilo uzata de la subjekto povas aperi kiel *per*-komplemento: ***Per sia terura mano** li prenis min je la kolo.* / ***Per tenajlo** li prenis la feron el la fajro.*

***mortigi*** La subjekto estas la kaŭzanto aŭ la kaŭzo de la morto. La objekto estas tiu, kiu mortas: *David* [...] *batis la Filiŝton kaj mortigis **lin**.* [Sm1.17] / *Troa drinkado mortigas **la drinkanton**.* Legu pli pri IG-verboj en §30.8.

***helpi*** Subjekto estas la faciliganto. Tio, kies tasko aŭ laboro estas faciligata, povas esti objekto: *Ĉiuj esperantistoj en la daŭro de la tuta jaro volonte helpados* ***la organizantan komitaton*** *per siaj konsiloj kaj laboroj.* [L1.84] Oni ankaŭ povas uzi *al*-komplementon anstataŭ objekto: *Rakontu al mi vian malfeliĉon, ĉar eble mi povos helpi* ***al vi****.* [FE.41]

## 30.4. Verboj kun *al*-komplemento

Multaj verboj povas havi *al*-komplementon (§12.3.5.1), sed ĉe kelkaj verboj la *al*-komplemento estas aparte grava. Ĉe tiaj verboj *al*-komplemento montras tiun, kiu profitas aŭ malprofitas de la ago. Tiaj verboj estas normale objektaj.

***doni*** Subjekto estas tiu, de kiu io iras, kaj kiu normale kaŭzas tiun iron. La objekto estas tio, kio transiras al iu. La *al*-komplemento estas tiu, kiu ricevas la objekton: *La patro donis* ***al mi*** *dolĉan pomon.* [FE.10] / *Ŝafoj donas lanon* ***al sia posedanto****.* / *Muziko donas plezuron* ***al la aŭskultantoj****.*

***lavi*** La subjekto estas normale tiu, kiu kaŭzas la lavadon. La objekto estas tio, kio fariĝas pura: *Mi lavis min en mia ĉambro, kaj ŝi lavis sin en sia ĉambro.* [FE.18] / *La lavisto lavis tolaĵon.* Ofte la objekto estas korpoparto. La posedanto de la korpoparto iel profitas de la ago, kaj povas aperi kiel *al*-komplemento: *Mi lavas* ***al mi*** *la manojn.* / *Li lavis* ***al la bebo*** *la vizaĝon.* Oni povas ankaŭ uzi posedan priskribon por montri la posedanton de la korpoparto: *Mi lavas* ***miajn*** *manojn.* / *Li lavis la vizaĝon* ***de la bebo****.*

***ŝteli*** La subjekto estas tiu, kiu kontraŭleĝe ekhavas ion, kaj kiu ankaŭ kaŭzas tiun ekhavon. La objekto estas tio, kio kontraŭleĝe transiras al la subjekto. Tiu, kiu perdas la objekton, malprofitas de la ago, kaj povas aperi kiel *al*-komplemento: *Vi ŝtelis* ***al mi*** *mian filon el la brakoj.* [Rt.50] Oni ankaŭ povas uzi *de*-komplementon por tiu, kiu perdas ion. Tio estas ofte pli klara esprimomaniero, ĉar efektive temas pri demovo: *Vi ŝtelis* ***de mi*** *karan horon.* [Rt.35] (La radiko ŜTEL estas ankaŭ uzata prefiksece kun speciala signifo: §38.4.1.)

***aparteni*** La subjekto estas havaĵo, posedaĵo aŭ simile. La *al*-komplemento estas tiu, kiu havas la aferon. Objekto ne aperas: *La rozo apartenas* ***al Teodoro****.* [FE.5] / *La estonteco apartenas* ***al ni****.* [FK.267] Legu ankaŭ pri *aparteni* kaj *havi* en §30.6.

## 30.5. Priskribaj verboj

Priskribaj verboj ligas priskribon al la subjekto aŭ la objekto. Tian priskribon oni nomas perverba priskribo (§25.1). Ĝi plej ofte ne havas rolmontrilon.

***esti*** La subjekto estas tio, kio havas ian econ. La eco aperas kiel perverba priskribo de la subjekto: *La domo estas* ***granda****.* / *Mia patro estis* ***ŝoforo****. Esti* povas ankaŭ esti sensubjekta: *Estas* ***varme****.* / *Estas* ***terure****.* Tiu, kiu sentas aŭ spertas econ povas aperi kiel *al*-komplemento aŭ *por*-komplemento: *Estas* ***al mi*** *malvarme kaj tiel malseke!* [FA1.55] / *Estas terure* ***por mi****.* Legu pli pri *esti* en §31.1.

***fariĝi*** La subjekto estas tio, kio ekhavas ian econ. La eco aperas kiel perverba priskribo: *La etoso fariĝis* ***bona****.* / *Ili fariĝis* ***ŝtelistoj****. Fariĝi* povas ankaŭ esti sensubjekta: *Fariĝis* ***malvarme*** *al mi.* / *Fariĝis* ***terure*** *por mi.*

***opinii*** La subjekto estas tiu, kiu havas opinion pri la eco de io. La objekto estas tio, kio havas la econ. La eco mem aperas kiel perverba priskribo de la objekto: *Mia fratino opinias viajn klopodojn* ***vanaj****.*

***bati*** Normale *bati* estas ordinara objekta verbo. La kaŭzanto estas subjekto, kaj tio, kion la batoj trafas, estas objekto. Iafoje ĉeestas ankaŭ eco, kiun la batado kaŭzas ĉe la objekto. La eco aperas kiel perverba priskribo de la objekto: *Ili batis lin* ***senkonscia****.*

## 30.6. Similsignifaj verboj

Iuj verboj montras baze la saman agon aŭ situacion. La ĉefa diferenco estas la reguloj por frazroloj. Ekzemploj de tiaj paroj estas *plaĉi*/*ŝati*, *havi*/*aparteni* kaj *manki*/*malhavi*.

***plaĉi*** La subjekto estas tio, kio havas bonajn ecojn aŭ kondutas bone. Tiu, kiu sentas plezuron pro tiu boneco, aperas kiel *al*-komplemento: *Al ĉiu besto plaĉas ĝia nesto.* [PE.347] / *Lia heroeco tre plaĉis al mi.* [FE.45]

***ŝati*** La subjekto estas tiu, kiu sentas plezuron pro la boneco de io. Tio, kio estas bona aŭ kondutas bone, aperas kiel objekto: *Ĉiu besto ŝatas sian neston.* / *Mi tre ŝatis lian heroecon.* Se oni konfuzas la frazrolojn ĉe *plaĉi* kaj *ŝati* oni riskas diri erarajn frazojn kiel: **Ĉiu besto plaĉas sian neston.** Aŭ: **Lia heroeco tre ŝatis al mi.** Origine *plaĉi* kaj *ŝati* estis malpli similaj. *Ŝati* signifis "rigardi kiel valoran, gravan", kio estas iom alia afero. Poste *ŝati* ŝanĝiĝis kaj fariĝis preskaŭ plene samsignifa kiel *plaĉi*, krom pri la frazroloj. Nun oni uzas la novan verbon *aprezi* por la malnova signifo de *ŝati*. Alian similan signifon havas *ami*.

***havi*** La subjekto estas tiu, kiu ion posedas aŭ simile. La objekto estas tio, kion la subjekto posedas: *Mi havas libron. Karlo havas blankajn ŝtrumpetojn.* Legu pli pri *havi* en §31.3.

***aparteni*** La subjekto estas tio, kion iu posedas aŭ simile. La posedanto aperas kiel *al*-komplemento: *Al mi apartenas libro. / Al Karlo apartenas blankaj ŝtrumpetoj.* Oni devas scii la regulojn por frazroloj por ne diri erarajn frazojn kiel: **Mi apartenas al libro.* / *Al Karlo havas blankaj ŝtrumpetoj.**

***manki*** Tio, kio ne ekzistas (aŭ ekzistas en nesufiĉa kvanto), estas subjekto: *Mankas al mi mono.* ≈ *Mono ne ekzistas ĉe mi.*

***malhavi*** Tio, kio ne ekzistas, estas objekto: *Mi malhavas **monon**.* ≈ *Mi ne havas monon (kvankam mi devus havi).* Estus eraro diri: **Mi mankas monon.** Same erara estus: **Malhavas al mi mono.**

## 30.7. Alternativaj frazkonstruoj

### Alternativaj subjektoj

Ĉe iuj verboj du aŭ pli da rolantoj povas aperi kiel subjekto. Tia verbo havas pli ol unu sencon. Kio aperu kiel subjekto, dependas de la senco, kiun oni celas:

***kovri*** Plej ofte *kovri* signifas "meti (ion) kovre". Tiam la subjekto estas tiu, kiu metas: ***Mi** bele kovris mian liton per multkoloraj teksaĵoj el Egiptujo.* [SS.7] Sed iafoje *kovri* signifas "esti kovraĵo, esti en kovra pozicio". Tiam la subjekto estas tio, kio estas en kovra pozicio. Eventuala metinto tiam normale ne aperas en la frazo: ***Nigra lana tuko** kovris ŝiajn harojn.* [M.116] / ***Tapiŝoj** kovris la plankon.* [FA3.59] En tiu dua senco *kovri* montras daŭran staton. Se oni pasivigas aktivan frazon kun *kovri*, la elekto de pasiva participo (§29.2.2) dependas de tio, ĉu oni celas la momentan agon "meti kovre" aŭ la daŭran staton "esti en kovra pozicio".

***bati*** *Bati* ordinare signifas "ektuŝegi (ion) per rapida movo de ia objekto". La subjekto tiam estas tiu, kiu movas la objekton: ***Li** batis sian hundon per bastono.* / ***Fiulo** pugnobatis min.* Sed iafoje *bati* signifas "forte moviĝi kaj trafi (ion) bate". Tiam la subjekto estas tio, kio moviĝas: ***Forta pluvo** batis la fenestran vitron.* / *Altan arbon batas **la fulmo**.* [PE.490] / ***La pugno** de la fiulo batis mian nazon. Bati* povas ankaŭ signifi "soni per batoj". Tiam la subjekto estas tio, el kio venas la sono: *Pro kio batas **la tamburo**?* [H.174] Se temas pri hor-montra batsono, la subjekto povas esti horloĝo: ***La horloĝo** sur la granda preĝeja turo ĵus batis la kvinan horon.* [FA2.52] Sed ankaŭ la horo povas aperi kiel subjekto: *Jam **la dekdua horo** batis.* [H.28]

### Alternativaj objektoj

Ĉe iuj verboj du aŭ pli da aferoj estas iel trafataj de la ago, sed en malsamaj manieroj. Iu ajn el ili povas aperi kiel objekto. (Alternativajn objektojn havas ankaŭ *sciigi* kaj *memorigi*, §30.8.)

***peti*** La objekto povas esti la persono, al kiu la peto direktiĝas, aŭ la afero, kiun la subjekto iel volas: *Ŝi tiel plenkore petadis **Dion** pri helpo.* FA1.169 / *Mi petas **pardonon** de vi.* M.183

***pardoni*** La objekto povas esti la persono, kies kulpon oni nuligas, aŭ la afero, pri kiu temis la kulpo: *Mi pardonis al la malamiko **lian kulpon**.* / *Mi pardonis **la malamikon** pri lia kulpo.*

***pagi*** La objekto povas esti la prezo, la aĉetaĵo, la pagilo aŭ la ricevanto de la pago: *Mi pagis **la prezon de la manĝo**.* / *Mi pagis **la manĝon** per dolaroj.* / *Mi pagis **dolarojn** por la manĝo.* / *Mi pagis **la kelneron** per monbiletoj.*

***danki*** La objekto normale estas tiu, kiu faris ion bonan kaj tial ricevas dankon: *Li tuj faris, kion mi volis, kaj mi dankis **lin** por la tuja plenumo de mia deziro.* FE.31 Sed en malnova uzo ankaŭ la kaŭzo de la danko povis esti objekto: *Al lia energia laborado nia afero dankas **multajn el siaj sukcesoj en Francujo**.* OV.247 Nuntempe oni ordinare uzas *ŝuldi* en tiaj esprimoj: *Mi ŝuldas mian sukceson al la subteno de mia edzino.*

Sed oni ne povas samtempe havi plurajn objektojn kun malsamaj rilatoj al la ĉefverbo. Ne diru: **Mi dankis **lin la tujan plenumon de mia deziro**.** / **Mi petas **vin pardonon**.** / **Mi pardonis **la malamikon lian kulpon**.** / **Mi pagis **la kelneron monbiletojn**.**

## 30.8. IG-verboj

Verboj faritaj per la sufikso IG (§38.2.17) estas ĉiam objektaj. Ili montras kaŭzadon de ia rezulto. La subjekto estas ĉiam la kaŭzo aŭ la kaŭzanto. La radiko aŭ radikoj antaŭ IG montras la rezulton.

### Eco aŭ stato kiel rezulto

Se la rezulto de IG-verbo estas **eco aŭ stato** (pozicio, identeco ...), la objekto estas tiu, kiu ricevas tiun econ, staton k.t.p.

***lacigi*** La objekto estas tiu, kiu fariĝas laca: *La tro multa parolado lacigas **lin**.* FE.40 / *La vojaĝo certe **vin** lacigis.* FA4.223 / *Tiu ĉi medikamento estas bona, sed ĝi lacigas **la uzanton**.*

***glaciigi*** La objekto estas tio, kio fariĝas glacio aŭ glacia: *Norda neĝo glaciigas **liajn piedojn**.* Rt.106

***edzinigi*** La objekto estas tiu, kiu fariĝas edzino: *Mi edzinigas **mian filinon** ne kun ia simpla nobelo.* Rz.86 / *Li edzinigis **ŝin** al si per la edziĝa ringo kontraŭ la volo de ŝia patro.* Rn.8

***enigi*** La objekto estas tiu, kiu estas movata en ion. La loko al kiu moviĝas la objekto estas montrata per *en* kaj N-finaĵo: *Ŝi verŝajne enigis* ***la manojn*** *en siajn densajn nigrajn harojn.* [M.56] / *Li enigis* ***la glavon*** *en la ingon.*

## Senobjekta ago kiel rezulto

Ĉe iaj IG-verboj la rezulto estas **senobjekta ago**. Oni tiam faris IG-verbon el alia verbo, kiu estas senobjekta. Ĉe tiaj IG-verboj la objekto estas la subjekto de la origina verbo.

***bruligi*** La objekto estas tio, kio ekbrulas: *Post infekta malsano oni ofte bruligas* ***la vestojn de la malsanulo****.* [FE.39] / *La suda suno bruligas* ***lian nudan kapon****.* [Rt.106]

***sidigi*** Objekto estas tiu, kiu estas metata en sidan pozicion: *Rapide ŝi prenis la infanon sur la brakojn kaj sidigis* ***ĝin*** *sur siaj genuoj.* [M.193] / ***La hundon*** *li residigis sur la keston.* [FA1.7]

### IG-verbo el IĜ-verbo

Principe oni tute rajtas aldoni IG al verbo kun IĜ-sufikso. La senco de tia IG-verbo estas kaŭzado de tiu ago, kiun esprimas la IĜ-verbo: *Li* [= Dio] *senkuraĝigas la ĉefojn de la popolo de la lando* [...] *kaj Li* ***ŝanceliĝigas*** *ilin kiel ebriuloj.* [Ij.12] = *Li igas ilin ŝanceliĝi kiel ebriuloj.* La ĉefoj ŝanceliĝas. Dio kaŭzas tiun ŝanceliĝadon. En la praktiko tiaj IG-verboj tamen estas ekstreme maloftaj.

Iafoje oni faras IG-verbon, kiu laŭsence estas bazita sur IĜ-verbo, sed kiu tamen ne enhavas IĜ. Oni povas diri, ke IĜ estas ellasita por simpligi la vorton: *Rajdmilicanoj* ***formovigis*** *la publikon. = ... formoviĝigis la publikon. = ... igis la publikon formoviĝi.* Oni trovas tian uzon ankaŭ ĉe Zamenhof: *Ili* ***ruligu*** *min kiel kortegan kurieron.* [Rz.68] = *Ili igu min ruliĝi. / Ili igu mian kaleŝon ruliĝi.* Ankaŭ tiaj IG-verboj estas tre maloftaj. Ili povas esti miskomprenataj. Vidu tuj ĉi-poste pri la ordinara uzo de IG post objekta verbo.

Oni notu la subtilan diferencon inter *formovi* kaj *formov(iĝ)igi*. Se oni formovas ion, oni mem rekte plenumas la movadon. Se oni formoviĝigas ion (igas ion formoviĝi), la kaŭzado estas malpli rekta. Oni iel influas ion por ke tio mem moviĝu. En la ĉi-antaŭa ekzemplo kun rajdmilicanoj, la milicanoj kredeble ne propramane movis la publikon, sed per timigado aŭ simile igis la publikon mem moviĝi for. Simile subtila estas la diferenco inter *ŝanceli* kaj *ŝanceliĝigi* en la ĉi-antaŭa zamenhofa ekzemplo. En la praktiko oni preskaŭ ĉiam preferas uzi *igi* kiel memstaran verbon por esprimi tiajn sencojn: *Li igas ilin ŝanceliĝi. / Rajdmilicanoj igis la publikon formoviĝi.* Tio estas plej ofte rekomendinda, ĉar multe pli klara.

### Objekta ago kiel rezulto

Ĉe iaj IG-verboj la rezulto estas **objekta ago**. Oni tiam faris IG-verbon el verbo, kiu jam estas objekta. Ekzistas du manieroj uzi tiajn IG-verbojn. La objekto de la IG-verbo povas esti la subjekto de la origina verbo, aŭ la objekto de la origina verbo. (Vidu pli da ekzemploj de verboj kun alternativaj objektoj, §30.7.)

***sciigi*** La objekto povas esti tiu, kiu ekscias ion: *Mi estas devigata sciigi **vin** pri tre malbela fakto, kiu okazis en nia tendaro.* [L2.209] La objekto povas alternative esti la sciaĵo: *La heroldoj rajdadis tra la tuta urbo kaj sciigadis **la fianĉiĝon**.* [FA1.102]

***memorigi*** La objekto povas esti tiu, kiu ekmemoras ion: *Tio memorigas **min** pri mia infanaĝo.* La objekto povas alternative esti la memoraĵo: *Tio memorigas al mi **mian infanaĝon**.*

Oni ne povas uzi ambaŭ eblojn samtempe. Ne diru: **Mi sciigos **vin malbelan fakton**.** Nek diru: **Tio memorigas **min mian infanaĝon**.**

## 30.9. IĜ-verboj

Verboj faritaj per la sufikso IĜ (§38.2.18) estas ĉiam senobjektaj.

### Ordinaraj IĜ-verboj

Ordinaraj IĜ-verboj montras transiron al nova stato. La radiko aŭ radikoj antaŭ IĜ montras la rezulton, la novan staton. La subjekto de ordinara IĜ-verbo estas tio, kio eniras en novan staton. Eventuala kaŭzanto de la transiro normale ne aperas en la frazo. Ĉe IĜ-verboj kaŭzanto ne estas interesa.

***malpuriĝi*** La subjekto estas tiu, kiu fariĝas malpura: *En la kota vetero **mia vesto** forte malpuriĝis.* [FE.39] / ***Ili** malpuriĝis per siaj faroj.* [Ps.106]

***glaciiĝi*** La subjekto estas tio, kio fariĝas glacio aŭ glacia: *Fariĝis vintro, kaj **la akvoj** glaciiĝis.* [FA3.62] / *Ĉi tie estas tiel malvarme, ke **la nuboj** glaciiĝas en bulojn.* [FA1.207]

***edziniĝi*** La subjekto estas tiu, kiu fariĝas edzino: ***Ŝi** edziniĝis kun sia kuzo.* [FE.39] / *Ĉu **ŝi** edziniĝos kun vi?*

***sidiĝi*** La subjekto estas tiu, kiu transiras en sidan pozicion. Ofte oni subkomprenas, ke tiu mem kaŭzis la eksidon (= *sidigis sin*, *eksidis*), sed la IĜ-verbo principe nenion diras pri eventuala kaŭzanto: ***Ŝi** fale sidiĝis sur ĝi* [= la ŝtuparo]. [M.141] / *Sidiĝu vin (aŭ sidiĝu), sinjoro!* [FE.39] / ***Li** sidiĝis rajde sur la kapro.* [FA3.96]

### IĜ-verboj faritaj el objektaj verboj

En IĜ-verboj faritaj el objektaj verboj ne temas pri ekesto de rezulto aŭ ŝanĝo de stato, sed pri ago, kiu okazas per si mem. Se ĉeestas statoŝanĝa signifo, tiu signifo estas jam en la origina verbo.

La ago de tia ĉi IĜ-verbo estas ago, kiu sen IĜ havas kaŭzanton kiel subjekton. Kun IĜ la kaŭzanto malaperas. Aŭ ne ekzistas kaŭzanto, aŭ oni ne interesiĝas pri eventuala kaŭzanto.

Ĉe IĜ-verbo farita el objekta verbo la subjekto estas la objekto de la origina verbo. Ĉe tiaj ĉi verboj IĜ do servas por inversigi la frazrolojn. Tio similas al pasivo (§29.1). Ĉe vera pasivo tamen kaŭzanto nepre ekzistas, kvankam oni eble ne mencias ĝin.

***detruiĝi*** La origina verbo *detrui* signifas "kaŭzi kompletan difekton aŭ malkonstruon": *La milito detruis la domojn.* La subjekto de *detruiĝi* estas tio, kio fariĝas komplete difektita aŭ malkonstruita. Ĉu iu detruis ĝin, ĉu ĝi fariĝis tia per si mem, tion la IĜ-verbo ne montras: *Se mi volus ankoraŭ esti mem leĝdonanto en la lingvo* [...]*, tiam* **la afero** *baldaŭ tute detruiĝus.* [OV.59] / ***Tiu ĉi domo*** *detruiĝis dum la milito.* ***Ĉiuj miaj planoj*** *disfalis kaj detruiĝis.*

***ruliĝi*** *Ruli* signifas "movi ion per turnado de ĝi aŭ ĝiaj radoj": *Rulu nun al mi grandan ŝtonon.* [Sm1.14] / *La vendisto rulis sian ĉaron laŭ la strato.* La subjekto de *ruliĝi* estas io, kio moviĝas turniĝante ĉirkaŭ si mem, aŭ veturilo, kiu moviĝas, ĉar ĝiaj radoj turniĝas: ***La vinberoj*** *elpremite ruliĝadis sur la teron.* [FA4.185] / *La amaso kuris malpli rapide ol la veturilo,* ***kiu*** *ruliĝis tre rapide.* [M.212] / ***La kaleŝo*** *ekruliĝis for.* [BV.35]

***troviĝi*** *Trovi* signifas "ekvidi, renkonti ion, kion oni eble serĉis": *Ĉu vi jam trovis vian horloĝon?* La subjekto de *troviĝi* estas tio, kio estas en ia loko aŭ kio simple ekzistas: *En la ĉambro troviĝis* ***spegulo tiel granda kiel pordo****.* [FA3.59] / *Baldaŭ* ***ili*** *troviĝis sur la strato Freta.* [M.105] / *En ĉiu objekto troviĝas* ***difekto****.* [PE.345] Antaŭe oni uzis *trovi sin* anstataŭ *troviĝi*: *Super la tero sin trovas* ***aero****.* [FE.26] Tio estas nun malofta.

***moviĝi*** *Movi* signifas "kaŭzi, ke io ne restu en sia loko": *Ŝi movadis siajn ĉarmajn membrojn.* [FA1.213] / *La maljuna saliko movis siajn branĉojn en la vento.* [FA2.21] La subjekto de *moviĝi* estas tio, kio ne restas en la sama loko: ***Amasoj da pasantoj*** *moviĝis sur la trotuaroj.* [M.115] / ***La balancilo*** *moviĝas.* [FA2.59] Oni povas ankaŭ uzi *movi sin*, kiam io konscie kaŭzas, ke ĝi mem ŝanĝu lokon: *Li nenion sentis de la vetero kaj ne movis sin de la loko.* [BV.78] Sed *movi sin* estas uzata ankaŭ por nekonscia moviĝado: *Ĉiuj flagoj sin movadis en la aero.* [FA1.102] Nuntempe oni uzas tamen pli ofte *moviĝi* en tiaj okazoj.

En multaj lingvoj oni uzas unu saman verbon por *komenci* kaj *komenciĝi*, kaj unu saman por *fini* kaj *finiĝi*. En Esperanto oni devas distingi:

- *komenci* = kaŭzi komencon. *Komenci* estas uzata kun ordinara objekto aŭ kun I-verba objekto. La objekto estas tio, pri kies komenco temas. La subjekto de *komenci* plej ofte estas persono:

*La instruisto **komencis** la lecionon.*

*Li **komencas** instrui.*

***Komencis** pluvi.*

- *komenciĝi* = eniri en komencan fazon (per si mem). La subjekto de *komenciĝi* estas tio, pri kies komenco temas. Tio preskaŭ ĉiam estas okazaĵo:

  *La leciono **komenciĝis**.*

  *La koncerto **komenciĝas**.*

  ***Komenciĝos** nova epoko.*

- *fini* = kaŭzi finon. *Fini* estas uzata kun ordinara objekto aŭ kun I-verba objekto. La objekto estas tio, pri kies fino temas. La subjekto de *fini* estas preskaŭ ĉiam persono:

  *La preleganto **finis** sian paroladon.*

  *Li baldaŭ **finos** paroli.*

- *finiĝi* = eniri en finan fazon, atingi sian finon (per si mem). La subjekto de *finiĝi* estas tio, pri kies fino temas. Tio preskaŭ ĉiam estas okazaĵo:

  *La prelego **finiĝis**.*

  *La danco **finiĝas**.*

  ***Finiĝos** ankoraŭ unu tago.*

Ne diru do: **La leciono **finis**.** **Kiam **komencos** la koncerto?** Se oni aŭdas tian frazon, oni volas scii, kion la leciono finis, kaj kion la koncerto komencos. Diru: *La leciono **finiĝis**. Kiam **komenciĝos** la koncerto?* Temas ja pri okazaĵoj, kaj okazaĵoj normale komenciĝas kaj finiĝas.

Iafoje tamen okazaĵo povas kaŭzi, ke alia afero komenciĝas aŭ finiĝas: *La unua mondmilito **komencis** novan epokon en la homa historio.* La subjekto ja estas okazaĵo, sed temas pri la komenco de la objekto, la nova epoko.

Legu ankaŭ pri *komenci*, *fini*, *daŭrigi* kaj *ĉesi* en §31.8.

### IĜ-verboj faritaj el senobjektaj transiraj verboj

Se verbo estas senobjekta, kaj se ĝi per si mem montras transiron al nova stato, aldono de IĜ normale estas sensenca kaj eĉ erara. Ekz. *morti* (§30.2) sen IĜ per si mem montras transiron de vivo al morto: *Lia filo **mortis** kaj estas nun malviva.* [FE.31] Sed iafoje oni tamen trovas tiajn verbojn kun IĜ-sufikso. Tiam IĜ aldonas ian specialan nuancon. Tiu nuanco povas esti “senvole, akcidente”: *En la nokto subite flamanta fajra kolono frapis tra la fenestroj, flamoj aperis sub la tegmento, la seka pajlo ekbrulis, la tuta domo forbrulis, kaj la juna pasero **mortiĝis**, sed la junaj homoj feliĉe sin savis.* [FA2.368] La morto de la pasero okazis pro akcidento. La subjekto de *mortiĝi* estas la sama kiel ĉe *morti*. Tia uzo de IĜ estas nuntempe malofta. Zamenhof uzis ankaŭ la verbon *ĉesiĝi*, kiu teorie devus signifi “iom post iom ĉesi”, sed li uzis ĝin tamen por la simpla senco “ĉesi”: *Ili ekrajdis tra la arbaro, kie la denseco fariĝis ĉiam pli granda, la vojo ĉiam pli mallarĝa, kie la vojo fine eĉ tute ***ĉesiĝis***. La prunelarbo baris al ili la vojon kiel*

*bartrabo, kiun oni devis ĉirkaŭrajdi.* FA4.42 Laŭ la kunteksto la ĉeso eĉ estis sufiĉe abrupta. Oni do uzu *ĉesis* aŭ *ekĉesis*. Por esprimi iom-post-ioman ĉeson, oni prefere uzu *iom post iom ĉesi*, *laŭgrade ĉesi* aŭ ion similan.

## Nenormalaj IĜ-verboj faritaj el objektaj verboj

Iuj IĜ-verboj faritaj el objektaj verboj estas uzataj en maniero, kiu ne kongruas kun la ĉi-antaŭaj klarigoj:

***sciiĝi*** La verbo *scii* estas objekta. La subjekto de *sciiĝi* povas esti tio, kio aperus kiel la objekto de *scii*: ***La novaĵo** rapide sciiĝis en la tuta urbo.* Tio estas tute regula kaj normala. Sed pli ofte, kiam oni uzas *sciiĝi*, oni uzas ĝin en la signifo "ekscii" (komparu kun *sidiĝi* = "eksidi"). La subjekto restas la sama kiel por *scii* dum la origina objekto fariĝas *pri*-komplemento: ***Mi** sciiĝis pri tio de homoj plej kredindaj.* Rz.6 Nuntempe oni ordinare uzas *ekscii*. En la komenca tempo Zamenhof eĉ uzis verbojn kiel *sciiĝi* kun objekto: *Tion ĉi neniu devas sciiĝi!* FA1.108 Nuntempe ĉiuj IĜ-verboj estas nepre senobjektaj, kaj oni diras: *Pri tio ĉi neniu devas sciiĝi!* Aŭ oni uzas *ekscii*: *Pri tio ĉi neniu devas ekscii!*

***timiĝi*** La verbo *timi* estas objekta verbo, kaj tial la formo *timiĝi* devus signifi pli-malpli "iĝi timata/timinda". Sed en la praktiko *timiĝi* estas uzata nur por la senco "ektimi", kaj la subjekto estas la timanto, kvazaŭ *timiĝi* estus bazita sur senobjekta verbo: *La sekvantan tagon **Marta** timiĝis, kiam ĉe la matena lumo ŝi ekvidis la vizaĝon de sia infano.* M.182 / ***Ĉiuj paseroj, eĉ granda korniko** timiĝis pro tiu stranga vidaĵo.* FA2.125 Temas pri ĝenerala timado sen efektiva objekto. Estas rekomendinde en tiaj ĉi okazoj uzi ĉiam *ektimi* anstataŭ *timiĝi*.

## 30.10. *Pri*-verboj

La rolvorteto *pri* (§12.3.6.10) estas ofte uzata prefiksece. En kelkaj okazoj ĝia sola tasko estas ŝanĝi la rolon de objekto:

***prirabi*** Ĉe la simpla verbo *rabi* la objekto estas la valoraĵo forprenata. Tiu, de kiu oni ĝin forprenas, povas aperi kiel komplemento kun *al* aŭ *de*: *Vi rabas al via homo **ĉion, kion li havas**.* [Rt.57] / *Oni rabis de mi **mian tutan monon**.* Ĉe *prirabi* la objekto anstataŭe estas tiu, de kiu oni ion forprenas. La valoraĵo ordinare ne menciiĝas, sed povas eventuale aperi kiel *je*-komplemento. *Ili nur prirabas **la vojaĝantojn**.* [Rz.28] / *Ili prirabis **Petron** je lia tuta havaĵo.*

***prisemi*** Ĉe la simpla verbo *semi* la objekto estas la semoj. La loko, kien la semoj metiĝas, povas aperi kiel loka aŭ direkta komplemento: *La terkultivisto semas **tritikon** en la kampo.* / *Kelkaj personoj komencis semi inter la esperantistoj **konfuzon kaj timon**.* [L2.88] Ĉe *prisemi* la objekto anstataŭe estas la loko, kien la semoj metiĝas. La semoj povas aperi kiel *per*-komplemento. *La terkultivisto prisemas **la kampon** per tritiko.* / *Dum ses jaroj prisemu **vian kampon**.* [Lv.25]

Legu pli pri prefikseca *pri* en §38.4.2.

## 30.11. Kompleksaj verboj

Verboj kiel *povi*, *voli*, *komenci*, *fini*, *ĉesi* k.a. ofte aperas kune kun I-verbo. La du verboj kune formas kvazaŭ unu kompleksan verbon. Normale la I-verbo signife estas la pli grava parto, kaj ĝi decidas la frazrolojn:

- *Komencis neĝi.* [FA1.142] (= *Ekneĝis.*) La ĉefverbo *komenci* per si mem normale postulas kaj subjekton kaj objekton, sed la frazkonstruon decidas *neĝi*, kiu estas sensubjekta kaj senobjekta verbo.
- *Baldaŭ ĉesos neĝi.* La ĉefverbo *ĉesi* normale havas subjekton, sed *neĝi* estas sensubjekta verbo.

  **Noto:** Oni normale ne diras **Baldaŭ finos neĝi**, ĉar *fini* montras plenumon, antaŭplanitan finpunkton aŭ simile. Sed ĉe neĝado ordinare tute ne ekzistas plenumo aŭ finpunkto. Neĝado simple iam ĉesas.

- *Ili ĉesis konstrui la urbon.* [Gn.11] La ĉefverbo *ĉesi* ne povas havi objekton, sed *konstrui* estas objekta verbo.
- *Li finis paroli.* [Jĝ.15] La ĉefverbo *fini* normale havas kaj subjekton kaj objekton, sed *paroli* ne bezonas objekton. Oni povus ankaŭ diri, ke ĝuste la I-verbo *paroli* estas la objekto de *fini*.
- *Ne povis esti alie.* [FA3.118] La ĉefverbo *povi* normale havas subjekton, sed *esti* povas esti sensubjekta (kun E-finaĵa perverba priskribo, §25.1.1).

# 31. Kelkaj gravaj verboj

## 31.1. *Esti*

La verbo *esti* havas plurajn signifojn kaj uzojn. Oni ofte nomas ĝin helpverbo, ĉar ĝi ne havas multe da signifo per si mem. Ĝi ĉefe helpas en frazkonstruado.

*Esti* estas uzata precipe por ligi priskribon al la subjekto. Tia priskribo nomiĝas perverba priskribo (§25.1.1):

- *La patro **estas** <u>sana</u>.* [FE.5]
- *Rozo **estas** <u>floro</u> kaj kolombo **estas** <u>birdo</u>.* [FE.5]
- *Ŝteli ĉe ŝtelisto **estas** <u>malfacile</u>.* [PE.316] La subjekto estas I-verbo (§25.1.1).
- *En la ĉambro* [...] ***estas** <u>iom mallume</u>.* [Rz.39] La frazo estas sensubjekta (§25.1.1).

*Esti* estas uzata kune kun participoj por formi kunmetitajn verbojn. Principe la participo en tiaj konstruoj estas perverba priskribo de la subjekto, sed *esti* + participo rolas kiel unu verbo (§28.4):

- *Li **estos** <u>dirinta</u> al mi la veron.* [FE.24]
- *Alproksimiĝis la tempo, kiam li **estis** <u>fariĝonta</u> submajstro.* [FA3.58]
- *Mi **estas** <u>amata</u>.* [FE.25]

*Esti* povas montri la ekziston aŭ aktualecon de la subjekto. Tiam kutime la subjekto staras post la ĉefverbo:

- *Sen regalo ne **estas** balo.* [PE.65]
- *Hodiaŭ **estas** sabato, kaj morgaŭ **estos** dimanĉo.* [FE.20]
- ***Estas** jam tempo, ke ni parolu pli klare kaj precize.* [OV.371]

Tiujn frazpartojn, kiujn mi ĉi tie klasis kiel subjektojn, oni eventuale povas anstataŭe klasi kiel perverbajn priskribojn en sensubjektaj frazoj (§25.1.1).

*Esti* povas montri troviĝon en loko aŭ situacio:

- *Kie vi **estas**? – Mi **estas** en la ĝardeno.* [FE.26] = *Kie vi troviĝas. – Mi troviĝas en la ĝardeno.*
- *Kie **estas** la knaboj? – Ili **estas** en la ĝardeno. – Kie **estas** la knabinoj? – Ili ankaŭ **estas** en la ĝardeno. – Kie **estas** la tranĉiloj? – Ili kuŝas sur la tablo.* [FE.16]
- *La mortinta homo **estas** nun supre en la ĉielo.* [FA1.60] = *... troviĝas nun supre ...*
- *Ĉiam la infanoj **estis** kune.* [FA3.58] Ĉiam ili troviĝis en la sama loko, en kuneco.

### Forlaso de *esti*

*Esti* ofte ne montras multe da signifo, sed servas preskaŭ nur kiel tenilo de verba finaĵo. Tial oni ofte proponis uzadon de nuda verba finaĵo anstataŭ *esti*: *En kastel' **'as** vestiblo. Mastro **'as** fore. Stelo **'as** turnita. Por li la*

*mond' **'as** malfermita.* Tiuj ekzemploj estas de *K. Kalocsay* en *Lingvo Stilo Formo*. Aliaj uzas simplan *as* (*is*, *os* ...) sen apostrofo. Tiaj eksperimentoj tamen neniam fariĝis popularaj. Nur en poezio oni povas renkonti tiajn memstarajn finaĵojn. Verŝajne la risko de konfuzo estas tro granda, ĉar oni povas aŭdi la nudan finaĵon kiel parton de la antaŭa vorto. *En kastel' 'as vestiblo* povas soni kiel *"en kastelas vestiblo"*. *Stelo 'as turnita* povas soni kiel *"stelas turnita"*.

> **Noto:** Iuj uzas *as* (*is*, *os* ...) anstataŭe kiel mallongigon de ia ajn verbo. Vidu noton en la klarigoj pri *fari* (§31.4).

## Verbigo de perverba priskribo

Alia maniero forlasi *esti* estas verbigi tiun priskribon, kiun *esti* ligas al la subjekto:

- *Kiu **estas** kuraĝa rajdi sur leono? → Kiu **kuraĝas** rajdi sur leono?* [FE.7]
- *La virinoj **estas** malsanaj fizike kaj morale. → La virinoj **malsanas** fizike kaj morale.* [M.1]
- *Ĉiu, kiu **estas** malsata, venu kaj manĝu. → Ĉiu, kiu **malsatas**, venu kaj manĝu!* [Rn.11]
- *Ĉu ĝi **estas** videbla? → Ĉu ĝi **videblas**?*
- *Ili **estus** venintaj, se ili **estus** sciintaj pri la kunveno. → Ili **venintus**, se ili **sciintus** pri la kunveno.* Legu pli pri tiaj mallongigoj de kunmetitaj verboj en §28.4.3.
- ***Estas** necese fari tion. → **Necesas** fari tion.*

Iuj opinias, ke estas eraro ĉi tiel verbigi vorton, kiu kutime estas A-vorto (aŭ E-vorto). Sed la ĉi-antaŭa ekzemplo kun *kuraĝas* estas el la *Fundamento*, kiu ankaŭ mencias la verbojn *sani* [FE.42] kaj *malsani* [FE.42]. Aliaj kutimaj verboj de tiu ĉi speco estas: *avari* [PE.16], *fieri* [PE.276], *egali* [M.177], *sufiĉi* [LR.54], *pravi* [PE.882], *favori* [Rz.85], *utili* [M.32], *simili* [FA2.65], *rapidi* [OV.412] k.t.p. Estas absurde deklari eraraj tiajn vortojn, kiuj troviĝas en la *Fundamento*, kaj kiuj estas vaste uzataj.

En iaj okazoj la verba formo estas tre malkutima, kaj oni normale uzas *esti* + A-vorton. Tiam ofte la nekutima verba formo esprimas nuancon specialan, pli viglan, pli atentigan, pli agan. Oni ne trouzu tiajn verbojn, ĉar tiam la speciala nuanco povus malaperi, kaj la lingvo malriĉiĝus. Ekz. oni normale ne diras *la ĉielo bluas*, sed *la ĉielo estas blua*. Oni ŝparu la verban formon por specialaj efektoj. Iafoje tamen la du formoj estas pli-malpli samnuancaj. Ekz. ne estas eĉ nuanca diferenco inter *pravi* kaj *esti prava*.

En multegaj okazoj la du formoj havas tute malsamajn signifojn. Radiko + verba finaĵo ne aŭtomate signifas "esti ia". Ekz. oni ne povas anstataŭ *ĝi estas ora* diri *ĝi oras*, ĉar *ori* signifas "kovri per oro". Kaj oni ankaŭ ne povas anstataŭ *la bildo estas kolora* diri *la bildo koloras*, ĉar *kolori* signifas "doni sian koloron (al io)". La signifo de ĉiu verbo dependas de la signifo de ĝia radiko: §37.2.4.

## 31.2. *Fariĝi* kaj *iĝi*

La du verboj *fariĝi* kaj *iĝi* estas ambaŭ faritaj el la sufikso IĜ (§38.2.18), kaj ambaŭ montras ŝanĝon de stato sen ekstera kaŭzanto. La subjekto estas tio, kio ŝanĝiĝas. La rezulto de la ŝanĝo aperas kiel perverba priskribo. *Fariĝi* estas pli tradicia, sed *iĝi* fariĝas pli kaj pli ofta, ĉar ĝi estas pli mallonga:

- *La juna vidvino **fariĝis** denove fianĉino.* [FE.33]
- *Ŝi **fariĝis** tiel malaminda, ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de si.* [FE.23]
- ***Fariĝis** nigre antaŭ ŝiaj okuloj.* [Rn.18] Sensubjekta frazo.
- *Karlo **iĝis** kuracisto.*
- *Ŝi **iĝis** tre kolera.*

*Fariĝi* estas ankaŭ uzata en frazoj, kie la subjekto mem estas la rezulto de la ŝanĝo. *Fariĝi* tiam signifas pli-malpli "fariĝi estanta", "okazi", "ekesti". En tiaj frazoj oni uzas ankaŭ *estiĝi*, sed malofte *iĝi*. Se la signifo estas "kreiĝi" oni neniam uzas *iĝi*, sed nur *fariĝi*, *estiĝi* aŭ *ekesti*:

- ***Fariĝis** somero.* [FA1.230]
- *Unu vesperon **fariĝis** granda uragano.* [FA1.27]
- *Kaj Dio diris: estu lumo; kaj **fariĝis** lumo.* [UL.19]

## 31.3. *Havi*

La verbo *havi* montras tute ĝenerale, ke la objekto apartenas al la subjekto. La aparteno povas esti poseda, porta, eca, interrilata, k.s.:

- *Mi **havas** centon da pomoj.* [FE.14] *= Cento da pomoj apartenas al mi.*
- *Unu vidvino **havis** du filinojn.* [FE.11] *= Al unu vidvino apartenis du filinoj.*
- *Kiam oni estas riĉa* [...]*, oni **havas** multajn amikojn.* [FE.16]
- *Mi **havas** nur unu buŝon, sed mi **havas** du orelojn.* [FE.12]
- *Kiun daton ni **havas** hodiaŭ?* [FE.12]
- *Tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon, kaj en tiu sama tempo ŝi **havis** teruran malamon kontraŭ la pli juna.* [FE.13]
- *Tiu ĉi urbo **havas** milionon da loĝantoj.* [FE.14]

Se oni volas pli precize esprimi la apartenan rilaton, oni povas anstataŭ *havi* uzi ekz. *posedi*, *porti*, *teni* kaj aliajn verbojn.

Legu pli pri la diferenco inter *havi* kaj *aparteni* en §30.6.

Iuj lingvoj uzas verbon similan al *havi* por fari kunmetitajn verbojn. Tio ne ekzistas en Esperanto. Oni ne diru **mi **havas** dirinta la veron**, **li **havis** veturis tien**, aŭ simile. En Esperanto oni normale uzas simplajn verbo-formojn (*diris*, *veturis* k.s.). Je bezono oni povas formi kunmetitajn verbojn (§28.4) per *esti*: *Mi **estas** dirinta la veron. Li **estis** veturinta tien.*

## 31.4. *Fari*

### Estiga *fari*

*Fari* povas signifi “estigi el io”. La objekto de *fari* estas tio, kion la subjekto estigas:

- *La botisto **faras** botojn kaj ŝuojn.* [FE.37]
- *La lignaĵisto **faras** tablojn, seĝojn kaj aliajn lignajn objektojn.* [FE.37]
- *El la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ **fari** aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj.* [FE.30]
- *Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo, kvankam ili ne ĉiam **estas faritaj** el tolo.* [FE.35]

*Fari* kaj *krei* estas similaj. *Fari* emfazas, ke oni uzas ian materialon, aŭ kunmetas iajn partojn, dum *krei* emfazas, ke oni estigas el nenio, aŭ ke oni estigas ion tute novspecan. Sed ne ĉiam oni zorge diferencigas *fari* kaj *krei*: *Dio **faris*** [= kreis] *la du grandajn lumaĵojn.* [Gn.1]

Estiga *fari* povas ankaŭ montri estigon de abstrakta rezulto. Normale la rezulto aperas kiel objekto:

- *Ni **faris** la kontrakton ne skribe, sed parole.* [FE.31]
- *Ni trovas bonan infanon, kiu **faras** ĝojon al siaj gepatroj.* [FA1.106]
- *Antaŭ tri tagoj mi vizitis vian kuzon kaj mia vizito **faris** al li plezuron.* [FE.20]
- *La sorto **faris**, ke ni ambaŭ kuŝis sub unu tendo.* [Rt.46] La *ke*-frazo estas objekto de *faris*.
- ***Faru** lume, varme kaj gaje.* [BV.69] = *Faru tiel, ke fariĝu lume, varme kaj gaje.* Ĉi tie la rezulto aperas kiel E-vorto, kio estas malpli kutima ĉe *fari*.

Estiga *fari* povas montri kunmeton de la subjekto aŭ subjektoj. La objekto montras la rezulton de la kunmeto:

- *Sesdek minutoj **faras** unu horon.* [FE.12]
- *Mil jaroj (aŭ milo da jaroj) **faras** miljaron.* [FE.14]
- *La popoloj **faros** en konsento unu grandan rondon familian.* [FK.298]
- *Kvin kaj sep **faras** dek du.* [FE.12] 5 + 7 = 12
- *Dek kaj dek **faras** dudek.* [FE.12] 10 + 10 = 20

Estiga *fari* povas signifi “agi tiel, ke la objekto ekestas ia aŭ io”. La rezulta eco aŭ identeco aperas kiel perverba priskribo de la objekto:

- *Vin mi volas **fari** <u>mia edzo</u>!* [FA3.98] = *Mi volas fari tiel, ke vi ekestas mia edzo.*
- *Tiun domon oni **faris** <u>malliberejo</u>.* [Jr.37]
- *Ĝi* [= la kolerego] ***faras** vin <u>ankoraŭ pli bela</u>.* [Rt.77]
- *Nia laboro kaj pacienco la mondon **faros** <u>feliĉa</u>!* [FK.302]
- *La Eternulo **faris** lin <u>timata de ĉiuj nacioj</u>.* [Kr1.14]

En tiaj ĉi frazoj *fari* tre similas al *igi* (§31.5). La diferenco estas, ke la perverba priskribo ĉe *fari* nur povas esti A-vorto aŭ O-vorto. Ĉe *igi* la rezulto normale estas I-verbo. *Fari* neniam aperas kun I-verba rezulto.

### Aga *fari*

*Fari* povas signifi "plenumi agon". La ago mem aperas kiel objekto:

- *Ŝi **faris** facilan kapsaluton al la mastrino.* M.29 = *Ŝi kapsalutis facile al la mastrino.*
- *Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke mi devas **fari** al vi donacon.* FE.15 = *... ke mi devas donaci ion al vi.*
- *Mi ne **farus** la eraron, se li antaŭe dirus al mi la veron.* FE.24

Aga *fari* povas esti ĝenerala verbo, kiu reprezentas ĉian ajn agon. Tiam *fari* ofte kunlaboras kun tabelvorto:

- *Du homoj povas pli multe **fari** ol unu.* FE.12
- *Li **faris** <u>ĉion</u> per la dek fingroj de siaj manoj.* FE.12
- *Dio ĝuste **faras**, neniam eraras.* PE.133
- *Ho, Dio! <u>kion</u> vi **faras**!* FE.26
- *Li tuj **faris*** [<u>tion</u>], *kion mi volis, kaj mi dankis lin por la tuja plenumo de mia deziro.* FE.31
- *Grandega hundo metis sur min sian antaŭan piedegon, kaj mi de teruro ne sciis, <u>kion</u> **fari**.* FE.38
- *La maljuna ministro atente aŭskultis, por povi diri tion saman, kiam li revenos al la reĝo; kaj <u>tiel</u> li ankaŭ **faris**.* FA1.109
- *La Izraelidoj **faris**, kiel diris Moseo.* Er.12
- *Mi abonas la Gazeton de Anoncoj, <u>kiel</u> li ankaŭ **faris**.* FA3.40

> **Noto:** Iafoje oni renkontas nuran verban finaĵon uzatan kiel mallongigon de ia ajn verbo: *Kion vi **as**? = Kion vi faras? / Ili jam manĝis, sed ni nur poste **os** (= manĝos).* Sed tia uzo aperas ordinare nur en eksperimentema aŭ ludema (parola) lingvaĵo.

> **Noto:** *Li faras nenion* kvazaŭ egalas al **li nenias** kun la neekzistanta tabelvorto **nenii**. *Li faris tiel* estas kvazaŭ egala al **li tiis** kun la neekzistanta tabelverbo **tii**. Tiaj agaj tabelverboj tamen ne povus ekzisti, ĉar iliaj U-formoj kolizius kun la ordinaraj tabelvortoj je U. Anstataŭe oni uzas *fari* + tabelvorton je O aŭ EL.

## 31.5. *Igi*

*Igi* = "kaŭzi, ke iu faru ian agon", "kaŭzi, ke iu aŭ io ekhavu ian econ". *Igi* estas farita el la sufikso IG (§38.2.17).

La subjekto de la verbo *igi* estas tiu, kiu kaŭzas la aferon. La objekto estas tiu, kiu faras la agon, aŭ kiu ekhavas la econ. La rezulto aperas kiel perverba priskribo de la objekto (§25.1.2):

- *Li **igis** ilin <u>vagadi</u> en la dezerto dum kvardek jaroj.* Nm.32 = *Li faris tiel, ke ili devis vagadi ...*
- *La finiĝado de la tago **igis** ilin <u>rapidi</u>.* M.200
- *En la lasta tempo li fervore laboris, por **igi** la francan registaron <u>enkonduki</u> Esperanton en ĉiujn lernejojn.* OV.247

- *Mi prenis kaj dissigelis* [la leteron]. *– Kiel do vi ...? – Mi mem ne scias. Nenatura forto min* ***igis***.[Rz.92] *= ... Nenatura forto min* ***igis*** *<u>preni</u> kaj <u>dissigeli</u> la leteron.*
- *Mi* ***igis*** *ĝin <u>nigra</u>. = Mi* ***nigrigis*** *ĝin.*
- *Tio* ***igis*** *ilin <u>disaj</u>. = Tio* ***disigis*** *ilin.*
- *Ŝia patro* ***igis*** *ŝin <u>edzino</u>. = Ŝia patro* ***edzinigis*** *ŝin.*
- *Li* ***igis*** *la foton <u>enkadra</u> (= tia, ke ĝi estis en kadro). = Li* ***enkadrigis*** *la foton.*

Zamenhof uzis *igi* nur kun la senco “kaŭzi, kiu iu faru ian agon”, do nur kune kun I-verbo. Sed nuntempe oni uzas *igi* ankaŭ kun la senco “kaŭzi, ke iu aŭ io ekhavu ian econ”, do kune kun A-vorto aŭ O-vorto.

*Igi* neniam signifas “krei” aŭ “produkti”. Ne diru: **Dio* ***igis*** *la mondon.* *La ŝuisto* ***igis*** *botojn al mi.** La objekto de *igi* ne povas esti la rezulto de la ago. Oni devas diri: *Dio* ***kreis*** *la mondon. La ŝuisto* ***faris*** *botojn al mi.*

## 31.6. *Lasi*

*Lasi* baze signifas “permesi” kaj “ne malhelpi”. La preciza signifo povas esti ekz. “permesi ke io restu (en loko aŭ en stato), permesi ke io foriru, ne malhelpi ke io ŝanĝiĝu, ne malhelpi ke io agu, ne plu teni, ne plu fari” k.t.p.:

- *Ŝteliston neniu* ***lasas*** *en sian domon.*[FE.37] *= Neniu permesas al ŝtelisto eniri en lian domon.*
- *Iru kun mi, bela Sara, en alian landon, ni* ***lasu*** *la malfeliĉon malantaŭ ni.*[Rn.15] *= ... la malfeliĉon ni ne kunportu.*
- *La tie kreskantaj beroj* ***lasas*** *post si en la mano, kiu ilin deŝiras, neforigeblan makulon.*[BV.13] Makulo restas en la mano.
- ***Lasu*** *la ŝercojn, Aleĉjo!*[M.56] *= Ne plu ŝercu!*
- *Eble vi* ***lasos*** *ĉe mi vian adreson?*[M.61] *= Eble vi donos al mi vian adreson antaŭ ol vi foriros?*
- ***Lasu*** *min! – ekkriis Marta jam laŭte kaj kun dolorĝemo, kaj kun spasma forto ŝi ektiris sian brakon.*[M.161] *= Ne plu tenu min!...*
- *Mian pekon Vi ne* ***lasos*** *senpuna.*[Ij.10] *= Vi ne permesos, ke mia peko restu senpuna.*
- *La preĝejajn spiritojn ni laŭ mia opinio ne devas* ***lasi*** *sen invito.*[FA2.93] *= Ni devas malhelpi, ke ili restu sen invito.*

### *Lasi* kun I-verbo

Ofte *lasi* aperas kune kun I-verbo. *Lasi* tiam signifas “permesi, ke la objekto faru la agon de la I-verbo”. La I-verbo tiam rolas kiel perverba priskribo de la objekto (§25.1.2):

- *Mi estas tre laca,* ***lasu*** *min nun iom <u>dormeti</u>.*[FA2.91] *= ... lasu, ke mi nun iom dormetu.*
- *Ŝi sidis kaj* ***lasis*** *la venton <u>ludi</u> kun ŝiaj longaj haroj.*[FA1.85] *= ... lasis, ke la vento ludis ...*

Iafoje la objekto de *lasi* (la senca subjekto de la I-verbo) estas forlasita:

- *La devigata senlaboreco premis ŝin terure, ne **lasis** <u>dormi</u>.* M.65 *= ... ne lasis **ŝin** dormi. = ... ne lasis, ke ŝi dormu.*

Iafoje oni metas la objekton de *lasi* post la I-verbo:

- *Ili perdas la kuraĝon kaj **lasas** <u>fali</u> **la manojn**.* OV.158 *= ... lasas, ke la manoj falu.*
- *Zorgu vivon vian kaj **lasu** <u>vivi</u> **alian**.* PE.922 *= ... lasu, ke alia* [persono] *vivu.*
- *Nur unu fojon en jaro oni povis **lasi** <u>kanti</u> **la birdon**, kaj eĉ tio ĉi estis granda risko.* FA2.30 *= ... lasi, ke la birdo kantu ...*

Se la I-verbo mem estas objekta verbo, ofte nur la kunteksto povas montri, ĉu la objekto apartenas al *lasi* aŭ al la I-verbo:

- *Se mi estus sur lia loko, mi ne **lasus** <u>tenti</u> **min** al tio.* FA1.179 Verŝajne *min* estas objekto de *tenti*: *... mi ne lasus, ke oni tentu min al tio.* Tiel ankaŭ efektive estas laŭ la kunteksto, sed teorie *min* ankaŭ povus esti objekto de *lasi*, kaj do senca subjekto de *tenti*: *... mi ne lasus, ke mi tentu* [iun] *al tio.*
- *Mi **lasis min** <u>moki</u>.* Gm.58 *= Mi lasis, ke mi moku iun.* Aŭ: *Mi lasis, ke oni moku min.* Ambaŭ signifoj estas eblaj. La kunteksto montras, ke la dua signifo estas ĝusta.
- *Mi **lasis ilin** tute <u>ĉirkaŭfermi</u>.* Rt.67 *= Mi lasis, ke ili tute ĉirkaŭfermu* [ion]. Aŭ: *Mi lasis, ke io tute ĉirkaŭfermu ilin.* La efektiva kunteksto montras, ke la dua signifo validas.

Se ĉeestas du objektoj, unu devas esti objekto de *lasi*, kaj la alia devas esti objekto de la I-verbo. Tiam oni nepre metu la du objektojn ĉe siaj respektivaj verboj tiel, ke la signifo estu klara:

- *Mi ne povis **lasi ilin** <u>detrui</u> **mian laboron**. Ilin* estas objekto de *lasi* (kaj senca subjekto de *detrui*). *Mian laboron* estas objekto de *detrui*.

En tiaj ĉi frazoj la senca subjekto de la I-verbo povas ankaŭ esti *al*-komplemento:

- *Ni **lasu al la amasoj**, <u>taksi</u> la aperojn laŭ ilia ekstera brilo.* OV.158 *= Ni lasu, ke la amasoj taksu la aperojn laŭ ilia ekstera brilo.*

Kiam la senca subjekto de I-verbo ne ĉeestas en la frazo, oni ofte traktas *lasi* + I-verbon kiel unu kompleksan verbon. Tio povas influi la uzon de *si* (§11.6.2).

### Aga *de*-komplemento ĉe *lasi* + I-verbo

Ĉe *lasi* + I-verbo oni iafoje uzas *de* por montri la sencan subjekton de la I-verbo. Tio estas ebla nur se la subjekto kaj la objekto de *lasi* estas identaj:

- *Ŝi tenis lian kapon super la akvo kaj lasis sin peli **de la ondoj** kien ili volis.* FA1.89 *= ... lasis, ke la ondoj pelu ŝin ... Ŝi* (subjekto de *lasis*) kaj *sin* (objekto de *lasis*) estas la sama persono.

En tiaj ĉi frazoj oni povas kompreni la I-verbon pasive:

- *Ŝi lasis sin* ***peli*** *de la ondoj. = Ŝi lasis sin* ***esti pelata*** *de la ondoj.*
- *Mi lasis min* ***delogi*** *de ŝi. = Mi lasis min* ***esti delogita*** *de ŝi.*
- *Karlo ofte lasas sin* ***trompi*** *de siaj malamikoj = Karlo ofte lasas sin* ***esti trompata*** *de siaj malamikoj (= la malamikoj de Karlo).*
- *Karlo ofte lasas sin* ***trompi*** *de liaj malamikoj = Karlo ofte lasas sin* ***esti trompata*** *de liaj malamikoj (= la malamikoj de alia viro).*

Tio klarigas, ke oni povas uzi *de*-komplementon por la aganto, ĉar *de* estas ĝuste tiel uzata en pasivaj frazoj (§29.1).

Rimarku, ke tia ĉi uzo de aga *de*-komplemento ĉe aktivforma verbo estas ebla nur ĉe *lasi*, kaj nur kiam la subjekto kaj objekto de *lasi* estas identaj.

### *Lasi* anstataŭ *igi*

*Lasi* kaj *igi* havas kune kun I-verbo similetajn signifojn, sed estas diferenco: *Igi* + I-verbo = "agi tiel, ke iu faru ion". *Lasi* + I-verbo = "ne malhelpi, ke iu faru ion". *Igi* montras aktivan kaŭzadon de ago, dum *lasi* montras pasivan permeson:

- *Mi* ***igis*** *lin labori. = Mi instigis lin labori. Mi konvinkis lin, ke li laboru.*
- *Mi* ***lasis*** *lin labori. = Mi permesis (ne malhelpis, ne kontraŭstaris) lian laboradon.*

Zamenhof pro nacilingva influo iafoje uzis *lasi* + I-verbon pri aktiva kaŭzado: *Li* ***lasis*** *fari al ŝi viran vestaĵon.* [FA1.99] *= Li igis tajloron fari al ŝi viran vestaĵon.* Ne temas pri permesado, sed pri aktiva taskado. Tia uzo de *lasi* estas evitinda. Diru prefere: *Li farigis al ŝi viran vestaĵon.*

## 31.7. *Povi*, *devi* kaj *voli*

*Povi*, *devi* kaj *voli* estas tre gravaj verboj. Oni ofte nomas ilin helpverboj, ĉar *povi*, *devi* aŭ *voli* + I-verbo (§27.3.1) estas kvazaŭ unu kompleksa verbo. La I-verbo en tia kompleksa verbo principe estas objekto de la helpverbo. La objekto de *povi* kaj *devi* estas ĉiam I-verbo. *Voli* ankaŭ povas havi alispecajn objektojn.

### 31.7.1. *Povi*

*Povi* montras agon aŭ staton, kiu estas ebla por la subjekto, ĉu pro kapablo, lerteco, forteco, potenco de la subjekto, ĉu pro la cirkonstancoj, ĉu pro rajto aŭ permeso. Nur la kunteksto povas montri la precizan signifon.

Tio, kio estas ebla por la subjekto, estas montrata de I-verbo. *Povi* kaj la I-verbo havas ĉiam la saman subjekton:

- *Du homoj* ***povas*** *pli multe <u>fari</u> ol unu.* [FE.12]
- *Ĉiu, kiu ŝin vidis,* ***povis*** *<u>pensi</u>, ke li vidas la patrinon.* [FE.11]
- *En malbona vetero oni* ***povas*** *facile <u>malvarmumi</u>.* [FE.42]
- *Starante ekstere, li* ***povis*** *<u>vidi</u> nur la eksteran flankon de nia domo.* [FE.31]

- *El la diritaj vortoj ni **povas** ankoraŭ <u>fari</u> aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj.* [FE.30]
- *Hodiaŭ en la nokto **povas** ja <u>fali</u> hajlo kaj ĉion forbati.* [Rt.80]
- ***Povas** <u>esti</u>, ke oni estas maljustaj koncerne ilin.* [FA2.94] La *ke*-frazo estas subjekto de *povas*.
- *Ŝi suprenfaldis sian jupeton, por **povi** <u>kuri</u> pli rapide.* [FA2.60]

Iafoje la I-verbo estas subkomprenata:

- *Mi faros ĉion, kion mi **povos**, por trovi por vi konforman okupon.* [M.36] *= ... kion mi povos fari ...*
- *Kion oni volas, tion oni **povas**.* [PE.299] *= ... tion oni povas fari.*
- *Li rapidis, kiel li nur **povis**.* [FA2.12] *= ... kiel li nur povis rapidi.*
- *Kiu devas, tiu **povas**.* [PE.213] Mankas tio, kion oni povas fari, ĉar temas pri povo rilate al ĉia ajn ago.

Se oni volas montri klare la kaŭzon de la eblo, oni uzu *kapabli*, *rajti*, *esti eble*, *esti permesite* k.t.p., sed plej ofte *povi* sufiĉas.

> **Noto:** Multfoje oni provis enkonduki la superfluan verbon **darfi*°* ≈ "rajti", sed ĉiam vane. Ĝi neniam fariĝis Esperanta vorto. Ne uzu ĝin.

### 31.7.2. *Devi*

*Devi* montras agon aŭ staton, kiu estas (pli-malpli) neevitebla por la subjekto, ĉu pro eksteraj cirkonstancoj, ĉu pro volo de alia persono, ĉu pro malpermeso, ĉu pro io alia. Nur la kunteksto povas montri la precizan signifon.

Tio, kio estas neevitebla por la subjekto, estas montrata de I-verbo. *Devi* kaj la I-verbo havas ĉiam la saman subjekton:

- *Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke mi **devas** <u>fari</u> al vi donacon.* [FE.15]
- *Tiu ĉi malfeliĉa infano **devis** du fojojn en ĉiu tago <u>iri</u> ĉerpi akvon en tre malproksima loko.* [FE.13]
- *Homo, kiun oni **devas** <u>juĝi</u>, estas juĝoto.* [FE.22]
- *La tranĉilo estis tiel malakra, ke mi ne povis tranĉi per ĝi la viandon kaj mi **devis** <u>uzi</u> mian poŝan tranĉilon.* [FE.34]
- *La ŝipanoj **devas** <u>obei</u> la ŝipestron.* [FE.37]
- *Ŝi ne estas tia, kia **devas** <u>esti</u> reĝino.* [FA1.174]
- *Prezentu al vi kiel tiuj arboj **devis** <u>brili</u> en la suna lumo!* [FA2.89] *= ... kiel tiuj arboj certe brilis ...*

*Devi* kun AS-finaĵo iafoje similas al OS-formo:

- *Venis al mi ia dezirego vidi vin ankoraŭ unu fojon antaŭ via morto, ĉar <u>morti</u> iam vi ja **devas**.* [FA2.136] *= ... ĉar sendube vi iam ja **mortos**.*
- *Li **devas** jam baldaŭ <u>veni</u>, sinjoro.* [BV.77] *= Sendube li jam baldaŭ **venos**, sinjoro.*

*Devi* kun IS-finaĵo povas iafoje montri, ke io estis intencata aŭ antaŭvidata. Tiam *devis* egalas pli-malpli al *estis ... onta* aŭ *estis ... ota*:

- *Sur la korto* [...] *staris nefermita ĉerko* [...]*, ĉar en tiu antaŭtagmezo* ***devis*** *okazi la enterigo.* FA3.17 ≈ *... estis okazonta la enterigo.*
- *Granda koncerto* ***devis*** *esti donata.* FA3.50 ≈ *... estis donota.*

Iafoje la I-verbo estas subkomprenata:

- *Mi pagis, al kiu oni* ***devis****.* M.6 = *... al kiu oni devis pagi.*
- *Kiu* ***devas****, tiu povas.* PE.213 Mankas tio, kion oni devas fari, ĉar temas pri devo rilate al ĉia ajn ago.

Se oni bezonas montri klare, ke temas pri devo pro ies volo, oni uzu esprimojn kun *oni volas ke ...*, *esti devigita* k.t.p.

### 31.7.3. *Voli*

*Voli* montras deziron aŭ intencon de la subjekto. La dezirata afero aperas kiel objekto, kiu plej ofte estas I-verbo.

Kiam *voli* estas uzata kun I-verbo, *voli* kaj la I-verbo nepre havas la saman subjekton:

- *Prenu mem akvon, se vi* ***volas*** *trinki.* FE.19
- *Mi* ***volis*** *lin bati, sed li forkuris de mi.* FE.18
- *Ŝi* ***volas*** *danci.* FE.20
- *Mi* ***volas*** *diri al vi la veron.* FE.24
- *Ŝi edziniĝis kun sia kuzo, kvankam ŝiaj gepatroj* ***volis*** *ŝin edzinigi kun alia persono.* FE.39

Kiam la objekto de *voli* estas *ke*-frazo, la dezirata ago estas ago de la subjekto de la *ke*-frazo (normale malsama al la subjekto de *voli*):

- *"Mi* ***volas*** *ke vi tien iru," diris la patrino, "kaj iru tuj!"* FE.19
- *Mi* ***volas****, ke tio, kion mi diris, estu vera.* FE.24

Kiam la objekto de *voli* estas O-vorto aŭ O-vorteca vorteto, nur la kunteksto povas montri, ĉu temas pri ago de la subjekto de *voli* aŭ pri ago de iu alia:

- *Mi* ***volas*** *ion, sed mi ne scias kion. Ion* kaj *kion* reprezentas ian agon deziratan de la subjekto. Ĉu estas ago de la subjekto, aŭ de iu alia, tion oni ne scias.
- *Mi* ***volas*** *la samon, kiel vi.* La objekto povas ĉi tie montri ian deziratan agon, sed ĝi ankaŭ povas montri ion, kion la subjekto volas havi (vidu ĉi-poste).
- *Li tuj faris, kion mi* ***volis****, kaj mi dankis lin por la tuja plenumo de mia deziro.* FE.31

Ĉi tia objekto de *voli* povas ankaŭ esti afero, kiun la subjekto volas havi, akiri aŭ ricevi. Oni povus diri, ke *havi* aŭ alia verbo estas subkomprenata:

- *Mi ne* ***volas*** *tiun ĉi supon, donu al mi alian.* Rz.27 = *Mi ne volas havi (ricevi, manĝi ...) tiun ĉi supon ...*

- *Se vi **volas** <u>filinon</u>, flatu la patrinon.* [PE.771]
- *<u>Kion</u> vi **volas** de mi, sinjoro?* [M.173] Ĉi tie *kion* montras agon aŭ aferon.

Iafoje *voli* aperas kun direkta esprimo, kiu montras lokon, kien la subjekto volas iri. Oni povus diri, ke ia mova verbo estas subkomprenata:

- *Mi **volas** <u>en militon</u>!* [FA2.148] = *Mi volas iri en militon.*
- *Mi **volas** <u>en la kaleŝon</u>!* [FA2.67]
- *Vi **volas** <u>malsupren</u>, <u>al via knabo</u>!* [FA4.140]

### Senobjekta *voli*

*Voli* estas ankaŭ uzata memstare sen objekto. Tiam *voli* signifas, ke la subjekto ĝenerale havas (fortan) volon, deziron aŭ intencon. Povas ankaŭ esti, ke la volata ago aŭ afero estas subkomprenata:

- *Se "ŝi" **volas**, ĉu oni povas tiam ion kontraŭfari?* [Gm.52]
- ***Voli** aŭ ne **voli** neniu malpermesas.* [PE.297]

### Ĝentila *voli*

Oni ofte uzas *voli* en ĝentilaj petoj k.s. *Voli* montras, ke ankaŭ la volo de la alparolato estas grava. Precipe ofta estas la kunmetaĵo *bonvoli*:

- *Aŭskultu, ĉu vi **volas** <u>alporti</u> ĉi tion de mi al la maljuna homo tie?* [FA2.144] *≈ Alportu ĉi tion ...*
- *Ĉu vi ne **volas** <u>esti</u> tiel bona kaj venigi por mi droŝkon* [...]*?* [FA1.119] *≈ Venigu por mi droŝkon.*
- *Permesu, ke virino, kiun vi **bonvolis** <u>elekti</u> kiel objekton de via amuziĝo, ripetu al vi la vortojn de malnova fablo.* [M.173]
- ***Bonvolu** <u>fermi</u> la pordon!*

Legu pli pri *bonvolu ... i* kaj aliaj manieroj fari ĝentilan peton en §26.3.

## 31.7.4. Neado de *povi*, *devi* kaj *voli*

Normale *ne* staras ĝuste antaŭ tio, kion ĝi neas (§21). Logike estas do diferenco inter *ne povi* kaj *povi ne*, inter *ne voli* kaj *voli ne*, kaj inter *ne devi* kaj *devi ne*.

### *Povi + ne*

Zamenhof zorge diferencigis *ne povi* (ofte uzeblan) kaj *povi ne* (uzeblan nur malofte).

*Ne povi* signifas, ke mankas povo fari ion:

- *Mi **ne povas** iri.* Mankas povo iri.
- *Li estas tiel dika, ke li **ne povas** trairi tra nia mallarĝa pordo.* [FE.33]
- *Fizikiston oni **ne povas** nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem.* [FE.32]
- *La tranĉilo estis tiel malakra, ke mi **ne povis** tranĉi per ĝi la viandon.* [FE.34]

*Povi ne* signifas, ke ja ekzistas povo, nome povo eviti ion:

- *Mi **povas ne** iri.* Ekzistas povo eviti iradon.
- *"Se la samovaro ne volas kanti,"* [...] *"ĝi **povas ne** kanti."* FA1.202 Ĝi povas eviti kantadon. Ne estas devo kanti.
- *La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo* [...], ***povas** en la unua tempo tute **ne** uzi la artikolon.* FE.27 Estas al ili permesate eviti la artikolon.

Oni eĉ povas kombini la du signifojn al *ne povi ne*, kio signifas, ke mankas la povo eviti ion:

- *Mi **ne povas ne** iri. = Mi devas iri, ĉar mankas la povo eviti iradon.*
- *Li tion faradis tiel lerte, ke oni **ne povis ne** ridi.* FA2.53 Estis neeviteble ridi.

### *Devi + ne*

Principe estas granda diferenco inter *ne devi* kaj *devi ne*. *Ne devi* logike signifas, ke mankas devo fari ion, ke regas libereco. *Devi ne* logike signifas, ke ekzistas devo eviti ion, ke mankas libereco. Tamen Zamenhof uzis *ne devi* kaj *devi ne* sendistinge. Normale li uzis *ne devi*, iafoje *devi ne*. La efektiva signifo estas tamen preskaŭ ĉiam "devi ne":

- *Oni **ne devas** havi tro multe da konfido al si mem.* M.170 *= Oni devas ne havi tro da konfido al si mem.*
- *Ŝi surmetis la ruĝajn ŝuojn – tion ŝi ja povis fari – sed tiam ŝi iris al la balo kaj komencis danci, kaj tion ŝi **ne devis** fari.* FA2.100 *= ... kaj tion ŝi devis ne fari.*
- *Pri gustoj oni disputi **ne devas**.* PE.262 *= Pri gustoj oni devas ne disputi.*
- *Memoru bone, ke de la komenco ĝis la fino de tiu laboro, se ĝi daŭrus eĉ jarojn, vi **ne devas** paroli; la unua vorto, kiu eliros el viaj lipoj, frapos kiel mortiga ponardo la koron de viaj fratoj.* FA1.170 *= ... vi devas ne paroli ...*
- *Mi **ne devas** agi kontraŭ mia konscienco.* M.58 *= Mi devas ne agi kontraŭ mia konscienco.*
- *Lernolibron oni **devas ne** tralegi, sed tralerni.* FE.31 La kontrasto inter *tralegi* kaj *sed tralerni* estas pli klara kun la logika vortordo *devi ne*.

La logikan signifon de *ne devi* Zamenhof normale esprimis per *ne bezoni*. Oni povas ankaŭ uzi *ne esti necese*:

- *Vi **ne bezonas** tiel rapidi.* FA1.11 *= Ne ekzistas devo por vi tiel rapidi.*
- *Kiu bone agas, timi **ne bezonas**.* PE.699 *= Kiu bone agas, por tiu ne ekzistas devo timi.*
- ***Ne estas necese**, ke vi tien iru. = Ne ekzistas devo por vi tien iri.*

Ĉion ĉi kaŭzis verŝajne, ke *ne* kutime staras antaŭ la ĉefverbo. Precipe influis la simileco kun *ne povi*, kiu estas la plej kutima nea formo de tiu verbo. Ĉe *devi* la inversa signifo estas la plej kutima, sed Zamenhof elektis uzi la plej kutiman formon por la plej kutima signifo.

Normale oni ankoraŭ sekvas la zamenhofan uzadon de *ne devi*, sed multaj nun efektive uzas *ne devi* kaj *devi ne* laŭ iliaj logikaj signifoj. Tio povas iafoje eventuale estigi konfuzon kaj miskomprenon.

En la parolo oni ofte distingas per elparola emfazado. Se temas pri manko de devo, oni emfazas la verbon *devi*. Alie oni emfazas alian vorton:

- *Vi **ne <u>devas</u>** iri tien.* Emfazo je *devas*. = *Ne ekzistas devo por vi iri tien.*
- *Vi **ne devas** <u>iri</u> tien.* Emfazo je *iri*. = *Vi devas ne iri tien.*

### *Voli + ne*

La diferenco inter *ne voli* kaj *voli ne* praktike estas tiel malgranda, ke ne gravas, kiun formon oni uzas. Normale oni uzas *ne voli*:

- *Mi **ne volas** iri.* Mankas volo iri, aŭ ekzistas volo ne iri.
- *Aleksandro **ne volas** lerni, kaj tial mi batas Aleksandron.* [FE.9]
- *Mi **ne volas** malhelpi vian ĝojon.* [FA1.73]

### 31.7.5. *Povus, devus* kaj *volus*

La verba finaĵo US (§26.4) normale montras, ke temas pri nereala, imagata ago. Sed la verbaj formoj *povus*, *devus* kaj *volus* havas tamen specialan signifon. Plej ofte ili esprimas realan devon, povon aŭ volon rilate al ago, kiun oni tamen ne faris, faras aŭ faros:

- *Mi **devus** labori. = Ja ekzistas por mi devo labori, sed mi tamen ne laboras.*
- *Mi **povus** foriri. = Estas al mi eble foriri, sed mi tamen restos.*
- *Mi **volus** helpi al vi. = Mi ja volas helpi al vi, sed tio ne estas ebla.*
- *Ili iris, sed ĝuste en la direkto ĝuste kontraŭa al tiu, en kiu ili **devus** iri.* [FA3.89]
- *Mi **povus** ĵuri al vi, ke ili estas sinceraj.* [Rt.73] Verŝajne mi tamen ne ĵuros, ĉar tio ne estas necesa.
- ***Volus** kato fiŝojn, sed la akvon ĝi timas.* [PE.559]

Iafoje *povus*, *devus* kaj *volus* tamen povas aperi kun la ordinara nerealeca senco de la US-finaĵo:

- *En grupo respektege staris en angulo la pastraro de la ĉirkaŭaĵo, kvazaŭ **devus** okazi enterigo, sed tie estis gaja festo, ĝi nur ankoraŭ ne sufiĉe ekmoviĝis.* [FA3.49] La devo estis nur ŝajno.

Se temas pri ago, kiun oni tamen ne faris, oni ne nepre devas uzi *povus*, *devus* aŭ *volus*. Se la kunteksto klare montras la sencon, oni ankaŭ povas uzi IS-finaĵon:

- *Mi **volis** lin bati, sed li forkuris de mi.* [FE.18] Mi ne sukcesis bati lin.
- *Nun la samovaro **devis** kanti, sed ĝi senkulpigis sin per malvarmumo.* [FA1.202] La samovaro ne kantis.
- *La ĉambelanoj, kiuj **devis** porti la trenaĵon de la vesto, eltiris siajn manojn al la planko, kvazaŭ ili levas la trenaĵon.* [FA1.112] La ĉambelanoj ne portis la trenaĵon, ĉar ĝi ne ekzistis. Tion la leganto jam scias.

- *La hundo tuj malaperis, kaj antaŭ ol la soldato **povis** pensi pri tio, li vidis ĝin jam returne kun la reĝidino.* FA1.9 Li tamen ne pensis pri tio.

## 31.8. *Komenci, fini, daŭrigi, ĉesi*

### *Komenci* kaj *fini*

*Komenci* kaj *fini* estas objektaj verboj. *Komenci* = "kaŭzi, ke io eniru en sian komencan fazon". *Fini* = "kaŭzi, ke io eniru en sian finan fazon, ke io atingu sian finon". Se la objekto estas I-verbo, ĝia senca subjekto estas la subjekto de *komenci* aŭ *fini*:

- *Ili volas nun ankaŭ **komenci** <u>kanti</u>.* FA2.123 ≈ *Ili volas nun ankaŭ **komenci** <u>la kantadon</u>.*
- *Salomono **finis** <u>preĝi</u>.* Rĝ1.8 ≈ *Salomono **finis** <u>sian preĝadon</u>.*
- *Ŝi **komencis** <u>interparoli</u> kun li.* ≈ *Ŝi* [...] ***komencis** <u>interparolon</u> kun li.* BV.87
- *Kiam mi **finos** <u>labori</u>, mi serĉos mian horloĝon.* ≈ *Kiam mi **finos** <u>mian laboron</u>, mi serĉos mian horloĝon.* FE.20

Legu pri la diferenco inter *komenci* kaj *komenciĝi*, kaj inter *fini* kaj *finiĝi* en §30.9.

### *Daŭrigi*

*Daŭrigi* devenas de la verbo *daŭri*. *Daŭri* = "plu esti, plu okazi". *Daŭrigi* = "kaŭzi, ke io plu estu aŭ plu okazu". *Daŭrigi* estas objekta verbo. Ĝia objekto povas esti ordinara O-vorto aŭ O-vorteca vorteto, sed ĝi ankaŭ povas esti I-verbo. Se la objekto estas I-verbo, ĝia senca subjekto estas la subjekto de *daŭrigi*:

- *Ili **daŭrigis** <u>sian interrompitan interparoladon</u>.* M.204 = *Ili rekomencis interparoli post la interrompo.*
- *Mi estis elektita por tri jaroj laŭ la volo de la nobelaro kaj mi **daŭrigadis** <u>mian oficon</u> ĝis la nuna tempo.* Rz.57 = *... mi plu oficis ĝis la nuna tempo.*
- *La morto **daŭrigis** <u>rigardi</u> lin per siaj grandaj malplenaj okulkavoj.* FA2.30 ≈ *La morto daŭrigis sian rigardadon de li ...*
- *Kial mi ne **daŭrigis** <u>sonĝi</u>?* Rt.43 ≈ *Kial mi ne daŭrigis mian sonĝadon?*
- *"Ho jes", ŝi respondis kun gaja rido kaj **daŭrigis** <u>kudri</u> diligente.* BV.53 ≈ *... kaj daŭrigis sian diligentan kudradon.*

### *Ĉesi*

*Ĉesi* estas senobjekta verbo. Ĝi havas du signifojn:

1. "komenci ne plu esti aŭ okazi"
2. "komenci ne plu agi (pri io)"

En la unua signifo la subjekto de *ĉesi* montras tion, kio komencas ne plu esti aŭ ne plu okazi. Tiam *ĉesi* ne estas uzata kune kun I-verbo. En tiaj ĉi frazoj *ĉesi* similas al *finiĝi*:

- *La muziko silentiĝis kaj la dancado **ĉesis**.* [BV.77]
- ***Ĉesis** la pluvo.*

En la dua signifo *ĉesi* estas uzebla kune kun *en*-komplemento, *kun*-komplemento, *pri*-komplemento, aŭ simile, kiu montras agon. La subjekto estas tiu, kiu komencas ne plu fari tiun agon. La komplemento tamen plej ofte estas I-verbo. Tiam la rolvorteto forfalas (§27.1), kiel kutime ĉe I-verboj:

- *Ili jam obstine celados al ĝi ĉiam pli kaj pli kaj ne **ĉesos** <u>en sia celado</u> tiel longe, ĝis ili la aferon atingos.* [FK.265]
- ***Ĉesu** do fine <u>kun viaj plorkantoj</u>!* [FA1.139]
- *La infano ne **ĉesas** <u>petoli</u>.* [FE.20] ≈ *La infano ne ĉesas en sia petolado.*
- *Oni postulas, ke mi nepre **ĉesu** <u>fumi</u>.* [L2.297] ≈ *... ke mi nepre ĉesu pri fumado.*
- *La patro de Antono **ĉesis** <u>esti riĉa komercisto</u>.* [FA3.144] ≈ *"... ĉesis pri sia komercista estado."*

Ofte oni diras, ke I-verbo post *ĉesi* estas objekto, sed tio ne estas ebla, ĉar *ĉesi* estas senobjekta verbo. *Ĉesi* + I-verbo similas al ekz. *sukcesi*, *ĝoji* kaj *honti* + I-verbo: *Feliĉe mi **sukcesis** <u>ekbruligi</u> la fajron.* [FA3.152] ≈ *Mi sukcesis en ekbruligado de la fajro. / Mi **ĝojas** vin <u>vidi</u>.* [H.15] ≈ *... ĝojas pri vidado de vi. / Kaj vi ne **hontas** <u>fanfaroni</u> per ĉi tio?* [Rt.19] ≈ *Kaj vi ne hontas pri fanfaronado per ĉi tio?*

El *ĉesi* oni povas fari la objektan verbon *ĉesigi*. Pro tio, ke *ĉesi* havas du signifojn, ankaŭ *ĉesigi* ricevas teorie du signifojn:

1. "kaŭzi, ke io komencu ne plu esti aŭ okazi"
2. "kaŭzi, ke io komencu ne plu agi (pri io)"

Praktike oni uzas nur la unuan signifon:

- *Clemency fine **ĉesigis** <u>sian senesperan penadon</u>.* [BV.83] Ŝi agis tiel, ke la penado ĉesis.
- *Oni **ĉesigis** <u>la dancadon</u>.* Oni agis tiel, ke la dancado ĉesis.
- *Io **ĉesigis** <u>la pluvon</u>.* Io kaŭzis, ke la pluvado ĉesis.

Teorie oni povas uzi I-verban objekton de *ĉesigi*, ekz.: *Nepre **ĉesigu** <u>fumi</u>.* = *Nepre igu vian fumadon ĉesi.* En la praktiko oni tamen uzas nur *ĉesi* kun I-verboj, kio donas praktike la saman sencon. Atentu pri la diferenco inter *li ĉesigis fumi* kaj *li ĉesigis la fumadon*. Se oni uzas I-verbon, temas nepre pri la fumado de li, la subjekto de *ĉesigis* (§27.1), same kiel *daŭrigi* + I-verbo (vidu ĉi-antaŭe). Sed se oni uzas *fumadon*, povas esti la fumado de iu ajn (§27.7). Oni povas precizigi per *li ĉesigis sian fumadon*, *li ĉesigis ilian fumadon* k.s.

La dua signifo de *ĉesigi* donus frazojn kiel: *Ili **ĉesigis** lin pri lia fiagado.* = *Ili kaŭzis, ke li ĉesis pri sia fiagado.* En la praktiko tiaj frazoj ne aperas.

## Malsimetrio inter *daŭrigi* kaj *ĉesi*

Ĉe I-verboj oni uzas *daŭrigi* kaj *ĉesi*, sed ne *daŭri* nek *ĉesigi*. Tio aspektas malsimetrie. La malsimetrio ekzistas jam ĉe *daŭri* kaj *ĉesi*. *Ĉesi* havas duan signifon, "komenci ne plu agi (pri io)", kiu estas uzebla antaŭ I-verbo, dum *daŭri* ne havas tian signifon. Se *daŭri* signifus ankaŭ "plu agi (pri io)", tiam oni povus diri ekz. **li daŭris pri fumado** kaj **li daŭris fumi**, simile al *li ĉesis pri fumado* kaj *li ĉesis fumi*. La verbo *daŭrigi* tamen ja havas signifon, kiu taŭgas ĉe I-verbo: *Li daŭrigis la fumadon. Li daŭrigis fumi. = Li igis la fumadon plu okazi.* Ankaŭ *ĉesigi* havas signifon, kiu taŭgas ĉe I-verbo, sed oni ne bezonas uzi *ĉesigi*, ĉar la pli mallonga verbo *ĉesi* sufiĉas. Estus eble krei simetrion, se oni ekuzus nur *ĉesigi* antaŭ I-verboj. Tio estus tute logika. La lingvo tiam fariĝus pli simetria (kaj ankaŭ pli peza). Sed kial ŝanĝi plene logikan lingvouzon nur por krei supraĵan simetrion?

## Hezito pri *daŭrigi* + I-verbo

Tradicie oni hezitas uzi *daŭrigi* + I-verbon. Tiu hezito estas senbaza. *Daŭrigi iri = igi iradon daŭri*. Komparu kun *komenci iri = igi iradon komenciĝi*. Se *komenci* povas esti uzata kun I-verba objekto, tiam ankaŭ *daŭrigi* povas esti tiel uzata.

**Noto:** Zamenhof verkis konfuzitan klarigon, kie li malkonsilis uzi *daŭrigi* + I-verbon (*Lingvaj Respondoj* p. 17, n-ro 21). Sed li ne obeis sian propran konsilon, kaj ja uzis *daŭrigi* + I-verbon. Nun oni pli-malpli tute libere uzadas *daŭrigi* tiel, kio estas tute logika kaj oportuna.

# 32. Frazospecoj

## 32.1. Fraztipoj kaj frazfunkcioj

Ekzistas kvar ĝeneralaj fraztipoj: deklaraj, demandaj, ordonaj kaj ekkriaj frazoj. Ili respondas principe al kvar malsamaj komunikaj celoj, sed ne ĉiam la vera celo de frazo egalas al la gramatika formo de la frazo.

### Deklaraj frazoj

Deklara frazo estas la baza tipo de frazo. Per tia frazo oni transdonas informojn, sed ĝi povas ankaŭ plenumi aliajn taskojn. Deklara frazo ne havas ian specialan signon:

- *Leono estas besto.* [FE.5] Simpla informo.
- *Li amas min, sed mi lin ne amas.* [FE.18] La frazo povas esti klarigo de agmaniero: *Tial mi evitas lin.*
- *La rozo apartenas al Teodoro.* [FE.5] Povas kaŝiĝi admono: *Do, vi ne prenu ĝin.*
- *La suno brilas.* [FE.5] La frazo povas esti invito: *Do, mi proponas, ke ni iru eksteren.*
- *Baldaŭ pluvos.* La frazo ŝajne estas transdono de fakta informo, sed temas vere nur pri opinio de la diranto. Ĝi eble ankaŭ estas propono iri endomen.
- *Mi sincere pardonpetas pro la malfruiĝo.* La frazo estas informa el pure gramatika vidpunkto, sed la vera celo estas peto. La signifo do proksimiĝas al: *Pardonu min pro la malfruiĝo!*
- *Mi promesas al vi fari tion.* La frazo ne nur rakontas, ke okazas promesado. Ĝi ankaŭ servas kiel promeso. La eldiro de la frazo estas la promeso mem. Se la frazo ne estus eldirita, la promesado ne vere okazus.

### Demandaj frazoj

Demanda frazo servas baze por serĉi informon. Demanda frazo havas demandan vorton, kiu normale staras komence de la frazo. *Jes/ne*-demandoj kaj alternativ-demandoj komenciĝas per *ĉu*. Aliaj demandoj komenciĝas per tabelvorto je KI:

- *Ĉu vi jam trovis vian horloĝon?* [FE.20]
- *Ĉu hodiaŭ estas varme aŭ malvarme?* [FE.25]
- *Kie estas la libro kaj la krajono?* [FE.6]
- *Kiun daton ni havas hodiaŭ?* [FE.12]
- *Ĉu vi havas korktirilon, por malŝtopi la botelon?* [FE.34] La frazo eble celas ricevi informon, sed ĝi ankaŭ povas esti peto transdoni korktirilon (se tia troviĝas). Depende de la situacio povus esti absurde simple respondi "jes". Ĝusta reago ofte estas nea respondo, transdono de korktirilo, aŭ montro, kie korktirilo troviĝas.

- *Kien vi iras?* [FE.26] Povus kaŝiĝi informo, ke la demandanto eventuale volus kuniri.
- *Ĉu vi povus malfermi la fenestron?* Temas plej verŝajne pri ĝentila peto: *Bonvolu malfermi la fenestron!* En tia okazo jesa respondo sen malfermado estus absurdaĵo aŭ ŝerco.
- *Kial vi ne respondas al mi? – Ĉu vi estas surda aŭ muta?* [FE.20] La vera senco povas esti esprimo de ĉagreno.
- *"Ĉu mi venis tien ĉi," diris al ŝi la malĝentila kaj fiera knabino, "por doni al vi trinki?"* [FE.19] Temas pri protesto. La demandanto ne volas respondon.

Legu pli pri demandoj kaj respondoj en §22.

## Ordonaj frazoj

Ordona frazo servas por influi la agadon de la alparolato per ordono, peto, admono, malpermeso, invito aŭ propono. Ordona frazo havas ĉefverbon kun U-finaĵo (§26.3), vola modo. Ordona frazo preskaŭ ĉiam havas la subjekton *vi*. Tial *vi* normale estas subkomprenata:

- *Iru for!* [FE.20] Ordono.
- *Nu, iru pli rapide!* [FE.26] Ordono.
- *Infano, ne tuŝu la spegulon!* [FE.20] Malpermeso.
- *Karaj infanoj, estu ĉiam honestaj!* [FE.20] Admono.
- *Ludoviko, donu al mi panon.* [FE.8] Peto.
- *Via reĝa moŝto, pardonu min!* [FE.42] Petego.
- *Sidigu vin (aŭ sidiĝu), sinjoro!* [FE.39] Invito al sidado.
- *Al leono ne donu la manon.* [FE.7] Ĝenerala informo pri prudenta agmaniero.
- *Hej, ni forkuru tuj!* Admono.
- *Ni estu gajaj, ni uzu bone la vivon, ĉar la vivo ne estas longa.* [FE.20] Konsilo.
- *Li venu, kaj mi pardonos al li.* [FE.20] Nerekta admono ne al la persono, kiu venu, sed al alia. Efektive la frazo estas pli informa ol ordona: *Se li venos (kaj mi volas, ke li venu), mi pardonos al li.*

Legu ankaŭ pri uzado de I-verbo anstataŭ U-verbo en §27.6.

## Ekkriaj frazoj

Ekkria frazo montras fortan senton pri io ekstrema. Ekkria frazo enhavas unu el la vortetoj *kia* (§15.3), *kiel* (§14.3.2) aŭ *kiom* (§14.3.3). La KI-vorto en ekkria frazo tute ne montras demandon. La KI-vorto normale staras komence de la frazo, ofte tamen post alia ekkria vorto:

- *Kia ĝoja festo!* [FE.10] = *Vere estas bonega ĝoja festo!*
- *Kia demando! kompreneble, ke mi lin amas.* [FE.41] *Kia* montras surprizon pro stranga demando.

- *Ha, kiel bele!* [FE.26]
- *Fi, kiel abomene!* [FE.26]
- *Kia granda brulo! kio brulas?* [FE.31] *Kia* montras fortan senton pri la grandeco de la brulo. *Kio* tamen estas pure demanda. Estas do du frazoj, unu ekkria, kaj unu demanda.
- *"Kiom multe vi scias!"* [...] *"kiel vi povoscias rakonti!"* [FA1.232] *Kiom* kaj *kiel* esprimas miron pri la scioj kaj rakontokapabloj de rakontanto.
- *Ho, kia okazaĵo! Kia* esprimas miron pri la ekstremeco de la okazaĵo. Ĉu la okazaĵo estis ekstreme plaĉa aŭ ekstreme malplaĉa, dependas de la situacio.

Iafoje *kio* povas montri kaj demandon kaj surprizon. Tiaj frazoj estas do duone demandaj, duone ekkriaj:

- *Ho, Dio! kion vi faras!* [FE.26] *Kio* esprimas miron pri io stranga, sed estas samtempe ankaŭ demanda.

## 32.2. Kompleksaj frazoj

### Kunmetitaj ĉeffrazoj

Pluraj ĉeffrazoj povas esti kunmetitaj per kunligaj vortetoj (§16). Ĉiu tia ĉeffrazo havas tiam sian propran ĉefverbon, kaj ĉiu tia ĉeffrazo funkcias gramatike tute aparte:

- *La libro estas sur la tablo, kaj la krajono kuŝas sur la fenestro.* [FE.6] La du frazoj estas ligitaj per *kaj*.
- *La patro ne legas libron, sed li skribas leteron.* [FE.9] La du frazoj estas ligitaj per *sed*.

### Komentofrazoj

Iafoje oni aldonas al frazo komenton, kiu estas aparta frazo. Tia komentofrazo ofte estas proksime ligita al la alia frazo, kaj povas eĉ troviĝi ene de la alia frazo:

- *Unu granda knabo – **nur pro malboneco li tion faris** – formanĝis la rompiĝintan fraŭlinon.* [FA3.58] Estas du frazoj, kiuj funkcias tute aparte, sed la dua estas enmetita en la unuan.
- *De ok jaroj, **tio estas de la tempo, kiam mi fariĝis estrino de ĉi tiu institucio**, konstante venadas ĉi tien virinoj de diversaj aĝoj.* [M.34] La intermetita komento klarigas la tempan komplementon *de ok jaroj*, sed estas aparta ĉeffrazo. La esprimo *tio estas* ofte enkondukas ĉi tiajn komentofrazojn.

Tiaj ĉi interplektitaj frazoj estas oftaj en literaturo. En parolo oni iafoje uzas similajn frazojn, sed en spontana parolo oni ofte post la komento anstataŭe rediras la unuan frazon de la komenco, ekz.: *Unu granda knabo – nur pro malboneco li tion faris – **li** formanĝis ... De ok jaroj, tio estas de la tempo kiam mi fariĝis estrino de ĉi tiu institucio, **de tiam** konstante venadas ...*

Se la unua frazo estas citaĵo (§36), kaj la komentofrazo havas verbon kiel *diri*, *demandi* aŭ simile, tiam la citaĵo rolas kiel objekto en la komentofrazo:

- *"Ĉu estas permesate demandi, kun kiu mi havas la plezuron paroli?"* ***demandis la jura konsilisto***. FA1.120
- *"Anjo tre ĝojos, kiam ŝi vidos vin!"* ***diris la patro***. FA3.59
- *Mi akompanos vin al la nova loĝejo, –* ***rediris la knabino****, – mi tuj vokos veturilon.* M.6 La intermetita komento klarigas, kiu diris la aferon.
- *Post unu horo, –* ***ŝi diris****, – mi venos al vi, Karonjo...* M.147

Tiajn citaĵojn oni povas transformi en subfrazojn. Tio nomiĝas nerekta parolo (§33.8).

Iafoje rilata subfrazo kun *kio* rolas simile kiel komentofrazo (§33.4.1.2).

### Subfrazoj

Subfrazo estas frazo, kiu partoprenas kiel frazparto de alia frazo: §33.

## 32.3. Mallongigitaj frazoj

En praktika lingvouzo oni ofte mallongigas frazojn ellasante multajn aferojn, kiuj estas kompreneblaj pro la kunteksto. Mallongigita frazo estas ofte pli klara ol kompleta frazo. Se iu demandas ekz. *Ĉu vi jam invitis Karlon al via festo?*, estas plej efike respondi ekz. *Ankoraŭ ne!* Estus tre malefike uzi la kompletan frazon: *Ne, mi ankoraŭ ne invitis Karlon al mia festo!*

### Forlaso de ĉefverbo

Precipe en parola lingvaĵo oni ofte forlasas la ĉefverbon kaj samtempe ankaŭ multajn aliajn frazpartojn. Tiaj mallongigoj estas eblaj, kiam antaŭe diritaj frazoj aŭ la situacio klarigas, kia estus la kompleta frazo:

- *– Kiu alvenis? –* ***Karlo!*** (= *Alvenis Karlo!*)
- *– Kiujn vi renkontis tie? –* ***Viajn gepatrojn!*** (= *Mi renkontis viajn gepatrojn tie!*)
- *– Kiel vi veturis tien? –* ***Per vagonaro!*** (= *Mi veturis tien per vagonaro!*)
- *– Kien ili iris? –* ***Dekstren!*** (= *Ili iris dekstren.*)
- *– Per kio vi riparis ĝin? –* ***Gluo!*** (= *Mi riparis ĝin per gluo!*)
- *– Mi aŭdis, ke li vizitis Eŭropon. –* ***Francujon kaj Germanujon fakte!*** (= *Li vizitis Francujon kaj Germanujon fakte.*)
- *– Mi preferas viandon kaj fiŝon. –* ***Mi, legomojn!*** (= *Mi preferas legomojn.*)
- *– Ĉu tio estis vi, kiu tusis, Janjo? —* ***Mi, panjo!*** M.193 (= *Tio estis mi, kiu tusis, panjo!*)
- *Aŭskultu, Güldenstern, kaj* ***ankaŭ vi****, Rosenkranz.* H.63 (= *... kaj ankaŭ vi aŭskultu ...*)
- *Singarde!* M.167 (= *Vi agu singarde!*)

En proverboj kaj simile oni ofte forlasas la ĉefverbon:

- *Kia drapo, tia vesto.* [PE.48] (= *Kia estas la drapo, tia estas ankaŭ la vesto.*)
- *Aŭ ĉio, aŭ nenio.* [PE.576] (= *Aŭ estu ĉio, aŭ estu nenio.*)

Vidu ankaŭ la klarigojn pri E-vorto kiel perverba priskribo (§25.1.1).

### Tradiciaj esprimoj

Ĝentilecaj kaj aliaj tradiciaj esprimoj ofte konsistas el sola frazparto. La kompleta frazo preskaŭ neniam estas uzata. Tiaj esprimoj malpli dependas de la parola situacio, ĉar ilia signifo estas difinita de la tradicio:

- *Bonan matenon!* [FE.10] (= *Mi deziras al vi bonan matenon!*)
- *Ĝojan feston!* [FE.10] (= *Mi deziras al vi ĝojan feston!*)
- *Saluton!* (= *Mi donas al vi saluton!*)
- *Dankon!* (= *Mi donas al vi dankon!*)
- *Ĉion bonan al vi kaj via familio!* (= *Mi deziras ĉion bonan al vi kaj via familio!*)
- *Fajron!* (= *Atentu la fajron!*)
- *Kia ĝoja festo!* [FE.10] (= *Kia ĝoja festo estas hodiaŭ / estis tiam.*)
- *Ĉu ne?* (= *Ĉu ne estas tiel?*)

Multaj tiaj ĉi esprimoj havas N-finaĵon. Uzo de N-finaĵo fariĝis kutima maniero konstrui tiajn ĉi esprimojn, kvankam ofte estas tute eble elpensi kompletan frazon, kiu donus formon sen N-finaĵo.

### Alvoko

La frazrolo alvoko (§12.1.2) estas tre ofte uzata sen ĉefverbo aŭ aliaj frazpartoj. Ofte nenia subkomprenata frazo ekzistas, la alvoko estas kiel kompleta frazo en si mem:

- ***Adamo!*** *– eksonis en tiu momento la voĉo de la loĝejmastrino.* [M.73]
- ***Marta! Marta!*** *– ekkriis la dua voĉo, virina.* [M.144]

### Forlaso de subjekto

Oni normale ne forlasas la subjekton de ĉefverbo, se la ĉefverbo mem ĉeestas en la frazo. Tio estas baza principo en Esperanto.

Oni tamen normale forlasas la subjekton de U-verbo en ĉeffrazo, se ĝi estas la plej kutima en tiaj frazoj, nome *vi*. Oni povas reteni la subjekton por emfazo, sed en tiaj frazoj ĝi normale forestas:

- *Venu al mi hodiaŭ vespere.* [FE.18] = ***Vi*** *venu al mi hodiaŭ vespere.*
- *Prenu mem akvon, se vi volas trinki.* [FE.19] = ***Vi*** *prenu mem akvon ...*
- *Helpu!* = ***Vi*** *helpu! Vi* = "ĉiu ajn, kiu aŭdas tiun ĉi krion".
- *Restu ĉiam tia(j).* = ***Vi*** *restu ĉiam tia(j).*
- *Mi jam havas mian ĉapelon; nun serĉu* ***vi*** *vian.* [FE.18] Ĉi tie la subjekto *vi* restas por emfazo, sed oni povus ĝin forlasi.

En subfrazo oni ne povas forlasi la subjekton eĉ ĉe U-verbo, ĉar en subfrazoj kun U-verbo la subjekto estas tre ofte alia ol *vi*:

- *Mi diris, ke **vi** venu al mi hodiaŭ vespere.* Ne: **Mi diris, ke venu al mi ...**
- *Mi volas, ke **vi** helpu min.* Ne: **Mi volas, ke helpu min.**
- *Jen tasko, kiun **vi** faru ĝis morgaŭ.* Ne: **Jen tasko, kiun faru ĝis morgaŭ.**

Iafoje ankaŭ ĉe U-verbo en ĉeffrazo ne estas eble forlasi la subjekton *vi*:

- *Tion faru **vi**, ne li. Tion faru ne li, sed **vi**.* Ĉi tie oni akcente kontrastigas la intencitan subjekton *vi* kun alia neintencita subjekto, *li*. Tial oni ne povas forlasi la pronomon *vi*.
- *Kiam mi* [...] *ekblovos per trumpeto, tiam <u>ankaŭ</u> **vi** blovu per la trumpetoj ĉirkaŭ la tuta tendaro* [...]! [Jĝ.7] Ĉi tie la vorteto *ankaŭ* rilatas ĝuste al la subjekto *vi*, kaj tial *vi* devas resti. Se oni forlasus la subjekton *vi*, la senco de *ankaŭ* ŝanĝiĝus.

En proverboj kaj simila lingvaĵo, kie oni deziras ekstreme densan esprimadon, forlaso de subjekto okazas ofte: *Atendis, meditis, ĝis en tombon englitis.* [PE.525]

Alispecaj forlasoj de subjekto okazas nur en rapida ĉiutageca parolo, nur en ĉeffrazoj, kaj nur kiam la kunteksto plene klarigas, kiu estas la subjekto:

- *– Kion li faris? – Iris al la urbo!* = ***Li** iris al la urbo!*
- *– Ĉu ŝi estas hejme?* [...] *– Eliris, sed baldaŭ revenos, – oni respondis de supre.* [M.78] = ***Ŝi** eliris, sed baldaŭ revenos ...*

Legu ankoraŭ ĉi-poste pri aliaj okazoj, en kiuj oni forlasas subjekton.

## Forlaso de komunaj frazpartoj

Kiam pluraj ĉeffrazoj estas kunligitaj, oni povas mencii nur unu fojon tion, kio aperas en ĉiuj ligitaj frazoj en la sama rolo:

- *Mi vekiĝis je la sepa horo. Mi preparis matenmanĝon. Mi manĝis ĝin. Mi ekiris al la laborejo je la oka. → Mi vekiĝis je la sepa horo, preparis matenmanĝon, manĝis ĝin, **kaj** ekiris al la laborejo je la oka.* Sufiĉas mencii la komunan subjekton *mi* nur unu fojon.
- *Li vekis la infanon. Ŝi vestis ĝin. Ili kune manĝigis ĝin. → Li vekis, ŝi vestis **kaj** ili kune manĝigis la infanon.* La komuna objekto estas menciita nur unu fojon.
- *Je la tria horo ni rigardis la horloĝon. Je la tria horo mia kolego diris, ke estas tempo por kafopaŭzo. → Je la tria horo ni rigardis la horloĝon, **kaj** mia kolego konstatis, ke estas tempo por kafopaŭzo.* La komuna *je*-komplemento povas esti menciita nur unu fojon.
- *Li faris al li solidan moralinstruon. Li klarigis al li, kian teruran malnoblaĵon li faris. Li klarigis al li, kia malbona homo li estas. Li klarigis al li, kiel forte li meritas punon. → Li faris al li solidan moralinstruon, klarigis al li, kian teruran malnoblaĵon li faris, kia malbona homo li*

*estas **kaj** kiel forte li meritas punon.* [FA1.22] La komuna subjekto *li* estas menciita nur unu fojon. La ĉefverbo *klarigis* estas komuna al ĉiuj frazoj krom la unua.

- *Ĉu vi akceptas sinjorinon Swicka en vian laborejon **aŭ** ne?* [M.109] Ĉi tie *ne* estas la sola restaĵo de la kompleta frazo: *Ĉu vi **ne** akceptas ŝin en vian laborejon?* Kombinante la du frazojn al unu, oni forstrekis el la dua ĉion, kio estis komuna kun la unua.

Se oni forlasas la ĉefverbon en ĉi tia frazo, tiam oni forlasas ankaŭ la subjekton, se ĝi estas la sama kiel antaŭe:

- *Petro manĝis la rizon, **kaj** poste li manĝis la viandon.* → **Petro manĝis la rizon, **kaj** poste li la viandon.** *Petro* kaj *li* estas la sama persono. Oni devas diri *... kaj poste la viandon*. Aŭ *... kaj poste manĝis la viandon.* Aŭ oni forlasas kaj la ĉefverbon kaj la subjekton, aŭ nur la subjekton.

Sed se la subjekto estas alia ol antaŭe, oni devas ĝin konservi: *Petro iris per buso, **kaj** Karlo per vagonaro. = ... kaj Karlo iris per vagonaro.*

Ne estas eble forlasi la subjekton el subfrazo, kiu estas enkondukita per subfraza enkondukilo (§33.1) kiel *ke*, *ĉar*, *se*, *ĉu*, KI-vorto k.t.p.:

- *Ŝi rakontis al mi, **ke** ŝi estis en Eŭropo.* → **Ŝi rakontis al mi, ke estis en Eŭropo.** Oni devas konservi la subjekton de la subfrazo.
- *Ŝi rakontis, ke ŝi estis en Eŭropo, kaj **ke** ŝi poste iris al Afriko.* → **Ŝi rakontis, ke ŝi estis en Eŭropo, kaj ke poste iris al Afriko.** Se oni forlasas la duan *ke*, oni povas forlasi ankaŭ la komunan subjekton: *Ŝi rakontis al mi, ke ŝi estis en Eŭropo, kaj poste iris al Afriko.*
- *Hodiaŭ mi vidis denove tiun knabinon, **kiun** mi renkontis hieraŭ.* → **Hodiaŭ mi vidis denove tiun knabinon, **kiun** renkontis hieraŭ.** Oni devas konservi *mi* en la *kiu*-frazo.

Ankaŭ ne estas eble forlasi la subjekton el demanda ĉeffrazo kun *ĉu* aŭ demanda KI-vorto:

- *Ĉu vi estis en la urbo, kaj **ĉu** vi aĉetis ĉion, kion mi petis?* → **Ĉu vi estis en la urbo, kaj ĉu aĉetis ĉion, kion mi petis?** Forlaso de la komuna subjekto estas ebla nur se oni forlasas la duan *ĉu*: *Ĉu vi estis en la urbo kaj aĉetis ĉion, kion mi petis?*
- *Ĉu vi vojaĝis bone, kaj **kiam** vi alvenis?* → **Ĉu vi vojaĝis bone, kaj kiam alvenis?** Oni devas konservi la subjekton *vi*.

### Mallongigo de O-vorta frazparto

Rektajn priskribojn de O-vorto oni povas ĉiam libere forlasi, kiam ili ne estas bezonataj.

Iafoje oni povas forlasi la ĉefvorton, la O-vorton mem, se ĝi estas komprenebla el la kunteksto. Ordinare devas resti almenaŭ unu antaŭmetita priskribo:

- *Amaso da fianĉoj, sed **la ĝusta** ne venas.* [PE.899] *= ... la ĝusta fianĉo ...*
- *Ĝi havis sufiĉe da floroj kaj kreskaĵoj por konsiderado. Tie staris **riĉaj** kaj **malriĉaj**, eĉ **kelkaj tro malriĉaj**.* [FA3.19] *= ... riĉaj floroj kaj kreskaĵoj*

*kaj malriĉaj floroj kaj kreskaĵoj, eĉ kelkaj tro malriĉaj floroj kaj kreskaĵoj.*

- *En la palaco ŝi estis* ***la plej bela el ĉiuj****.* [FA1.98] *= ... la plej bela knabino el ĉiuj.* Ĉi tie restas kaj antaŭpriskribo (*la plej bela*), kaj postpriskribo (*el ĉiuj*).
- *La filo de la najbaro alportis al li ankaŭ kampajn florojn, inter kiuj hazarde troviĝis ankaŭ* ***unu kun sia radiko****.* [FA2.23] *= ... ankaŭ unu floro kun sia radiko.* Restas la antaŭpriskribo *unu*, kaj la postpriskribo *kun sia radiko*.

Legu ankaŭ pri O-vorteca uzo de A-vortoj en §5.2.

Sola antaŭmetita *la* ne sufiĉas por forlasi O-vorton. Ne estas ĝuste diri: **Estas du domoj. Li loĝas en* ***la el ŝtono****.** Oni diru: *Li loĝas en* ***la domo el ŝtono***. Aŭ: *Li loĝas en* ***tiu el ŝtono*** / *Li loĝas en* ***la ŝtona****.*

Se post forlaso de O-vorto restas nur postmetita priskribo, kiu konsistas el rolvorteto kaj O-vorto, la rezulto ofte estas tro malklara: **Li ŝatas filmojn el Britujo, dum mi preferas* ***el Barato****.** Estas rekomendinde konservi la O-vorton: *... dum mi preferas* ***filmojn el Barato***. (Se oni anstataŭe uzas A-vortan priskribon, ne estas problemo: *Li ŝatas britajn filmojn, dum mi preferas* ***baratajn****.*)

Se la O-vorto estas difinita (per *la* aŭ alia difinilo), oni povas anstataŭigi ĝin per *tiu(j)*: *La reĝo malfermis malgrandan ĉambron tute apude de* ***tiu, en kiu ŝi estis dormonta****.* [FA1.172] *= ... tute apude de* ***la ĉambro, en kiu*** *...* Legu pli pri *tiu* anstataŭ O-vorto en §15.1.

# 33. Subfrazoj

## 33.1. Kio estas subfrazo?

Ene de frazo povas troviĝi alia frazo, kiu rolas en la ĉeffrazo kiel frazparto. Tian malĉefan frazon oni nomas subfrazo. Subfrazoj plej ofte ne havas rolmontrilon. Por demonstri la rolon de subfrazo en la ĉeffrazo oni ofte povas en klarigo anstataŭigi la subfrazon per vorto, kiu povas havi rolmontrilon, ekz. *tio* aŭ alian tabelvorton.

En la plej simpla okazo subfrazo staras fine de ĉefa frazo:

- *Li diris, **ke li estas malsata**. → Li diris **tion**.* La *ke*-frazo rolas kiel objekto en la ĉeffrazo.
- *Li demandis, **ĉu mi amas lin**. → Li demandis **tion**.*
- *Petro demandis, **kial la preparoj daŭras tiel longe**. → Petro demandis **tion**.*
- *Mi legis libron, **kiun tradukis Zamenhof**. → Mi legis libron **tian**.* La *kiu*-frazo estas rekta priskribo de la vorto *libron*.
- *Mi kuniros, **se vi promesas helpi min**. → Mi kuniros **tiukondiĉe**.* La *se*-frazo estas kondiĉa komplemento.
- *Mi manĝis la panon, **kvankam ĝi estis malnova**. → Mi manĝis la panon **malgraŭ ĝia malnoveco**.* La *kvankam*-frazo estas komplemento, kiu montras nesufiĉan malhelpaĵon.

Subfrazo povas ankaŭ stari komence de ĉefa frazo:

- ***Ke la tero estas ronda**, neniu povas plu pridubi. → **Tion** neniu povas plu pridubi.*
- ***Kiam li venis**, mi jam foriris. → **Tiam** mi jam foriris.* La *kiam*-frazo estas tempa komplemento.
- ***Se Zamenhof skribis tiel**, tio certe estas ĝusta. → **Tiuokaze** tio certe estas ĝusta.*

Ofte subfrazo staras ene de ĉefa frazo. La ĉefa frazo pludaŭras post la fino de la subfrazo:

- *La fakto, **ke la tero estas ronda**, ankoraŭ ne estas akceptita de ĉiuj.* La *ke*-frazo estas identiga priskribo de la vorto *fakto*.
- *Via argumento, **kiun mi ne akceptas**, estas tamen lerte elpensita.*
- *Mi konsentas, **se vi tenos viajn promesojn**, kuniri al la festo.*
- *La demando, **kiel la universo estiĝis**, ne estas ankoraŭ kontentige respondita.*

Ofte subfrazo eĉ estas disigita:

- ***Kion** vi aŭdis, **ke oni diras**?* La demandvorto *kion* apartenas al la subfrazo. Ĝi estas objekto de *diras* (komparu: *vi aŭdis, **ke oni diras tion***). Legu pli pri tia antaŭmetado de frazparto en §34.2.2.

Ofte subfrazo enhavas alian subfrazon, kiu rolas kiel frazparto en la unua subfrazo:

- *Mi sciis, **ke li ne faros, kion li promesis**.* La frazo *kion li promesis* estas subfrazo de la *ke*-frazo.

Oni ofte faras frazojn kun pluraj niveloj de subfrazoj. La strukturo povas esti surprize komplikita, ankaŭ en kutimaj frazoj.

- *Li diris, **ke li jam faris tion, kion mi petis, ke li faru, kiam li revenos**.*

Tiu sufiĉe ordinara frazo havas la jenan surprize malsimplan strukturon:

- La unua subfrazo estas: ... *ke li jam faris tion* ... Ĝi estas subfrazo de la ĉeffrazo.
- La dua subfrazo estas: ... *mi petis* ... Ĝi estas subfrazo de la unua subfrazo. La duan subfrazon enkondukas la la vorto *kion*, kiu vere apartenas al la tria subfrazo.
- La tria subfrazo estas disigita: ... *kion* ... *ke li faru* ... (≈ ... *ke li faru tion* ...). Ĝi estas subfrazo de la dua subfrazo.
- La kvara subfrazo estas: ... *kiam li revenos.* Ĝi estas subfrazo de la tria subfrazo.

### Enkondukiloj de subfrazoj

Subfrazo normale komenciĝas per ia enkonduka vorteto (frazenkondukilo):

- *Ke* (§33.2) estas la plej grava frazenkondukilo.
- *Ĉu* (§33.3) enkondukas demandajn subfrazojn.
- KI-vortoj enkondukas demandajn subfrazojn (§33.3) kaj rilatajn subfrazojn (§33.4).
- *Se* (§33.5) enkondukas kondiĉajn subfrazojn.
- *Ĉar* (§33.6) enkondukas subfrazojn de kaŭzo kaj motivo.
- Aliaj frazenkondukiloj estas *apenaŭ* (§33.7), *dum* (§33.7), *ĝis* (§33.7), *kvankam* (§33.7), *kvazaŭ* (§33.7) kaj *ol* (§33.7).

## 33.2. *Ke*-frazoj

La vorteto *ke* ne vere montras ian signifon. Ĝi nur montras la komencon de subfrazo, kiu ne havas alian frazenkondukilon. *Ke*-frazo povas roli en multaj diversaj frazroloj.

### 33.2.1. *Ke*-frazoj kiel subjekto

Subfrazo, kiu komenciĝas per *ke*, povas roli kiel subjekto. Tia *ke*-frazo kutime staras en fina pozicio:

- *Okazis, **ke la reĝino mortis**. → **Tio** okazis.*
- *Ŝajnas, **ke pluvos**. → **Tio** ŝajnas.*
- *Estas vero, **ke ŝi havis sur si pantoflojn**.* [FA2.112] → ***Tio** estas vero.*
- *Ŝajnas al mi, **ke el ŝia buŝo elsaltas perloj kaj diamantoj**.* [FE.17] → ***Tio** ŝajnas al mi.*

- *Al li eĉ ne venos en la kapon,* ***ke la vorto estas kunmetita.*** [LR.51A] → ***Tio*** *eĉ ne venos al li en la kapon.*
- *Kompreneble,* ***ke mi lin amas****.* [FE.41] La ĉefverbo estas subkomprenata: ***Estas*** *kompreneble, ke mi lin amas.* → ***Tio*** *estas komprenebla.*

### Helpa *tio*

Kelkfoje oni uzas la vorteton *tio* kaj *ke*-frazon kunlabore:

- *Ĉu* ***tio*** *estas vera, <u>ke li mortigis sin</u>?*
- *Okazis* ***tio****, <u>ke la ŝtelinto forfuĝis</u>.*

En ĉi tiaj frazoj *tio* kaj la *ke*-frazo reprezentas la saman aferon. Oni povas nomi tion **helpa *tio***, ĉar la vorto *tio* gramatike estas senbezona. Ĝi nur helpas al la klareco. Se oni uzas helpan *tio* kune kun subjekta *ke*-frazo, la *ke*-frazo iom emfaziĝas. El gramatika vidpunkto la *ke*-frazo rolas kiel klariga priskribo de *tio* (§33.2.4). Helpa *tio* estas uzata ankaŭ ĉe aliaj specoj de subfrazoj, ekzemple demandaj subfrazoj (§33.3).

Zamenhof iafoje uzis *ĝi* anstataŭ *tio* (§11.5), ankaŭ en ĉi tia helpa rolo. Nun oni uzas nur *tio*.

### 33.2.2. *Ke*-frazoj kiel objekto

*Ke*-frazo ofte rolas kiel objekto, sed *ke*-frazo ne povas akcepti la finaĵon N. Se oni anstataŭigas la subfrazon per O-vorto aŭ tabelvorto je O, tiu devas havi N:

- *Diru al la patro,* ***ke mi estas diligenta****.* [FE.8] → *Diru* ***tion*** *al la patro.*
- *Oni diras,* ***ke la vero ĉiam venkas****.* [FE.16] → *Oni diras* ***tion****.*
- *"Pardonu al mi, patrino,"* [...] ***"ke mi restis tiel longe****".* [FE.17] → *Pardonu* ***mian malfruiĝon*** *al mi, patrino.*
- *"Mi volas* ***ke vi tien iru*** [...]*!"* [FE.19] → *Mi volas* ***tion****.*
- *Se li scius,* ***ke mi estas tie ĉi****, li tuj venus al mi.* [FE.20] → *Se li scius* ***tion*** *...*
- *Subite li aŭdis,* ***ke iu alrajdas de la vojo al la domo****.* [FA1.15] → *Subite li aŭdis* ***tion****.*
- *Pri talento mi neniam aŭdis,* ***ke vi ian havas****.* [M.156] → *Pri talento mi neniam aŭdis* ***tion****.*
- *Vi efektive pensas,* ***ke ne****?* [BV.53] → *Vi efektive pensas* ***tion****?* La subfrazo estas draste mallongigita, = ... *ke tiel ne estas*, aŭ simile.
- *Klare li sentis en sia animo,* ***ke li kore amas Anjon*** *kaj* ***ke ŝi devas fariĝi lia kara edzineto****.* [FA3.58] = *Klare li sentis en sia animo* ***tion*** *kaj* ***tion****.*

Ĉe objekta *ke*-frazo oni malofte uzas helpan *tio*. Sed tio ja estas ebla:

- *Vi kaŭzis* ***tion, ke mi devas vin malestimi!*** [FA2.19]
- *Ĉu povas esti, ke mi bedaŭris* ***tion, ke mi ne faris malhonestaĵon****?* [M.62]

### Ŝajne du rektaj objektoj

En frazoj, kiuj havas *ke*-frazon kiel objekton, aperas ofte alia frazparto kun N-finaĵo. Tiam povas ofte ŝajni, ke estas du rektaj objektoj kun malsama rilato al la ĉefverbo. Tio normale estus eraro.

Se la alia objekto aperas ene de la *ke*-frazo, ĝi estas objekto de la *ke*-fraza ĉefverbo, ekz.: *Mi vidis, ke ili manĝas **fiŝon***. La tuta *ke*-frazo estas objekto de *vidis*. *Fiŝon* estas objekto de *manĝas*.

Se la alia objekto ne troviĝas en la *ke*-frazo, la klarigo povas esti, ke la *ke*-frazo ne vere estas objekto, sed ekz. komplemento (§33.2.3). Alternative povas esti, ke la alia objekto fakte ne estas objekto, sed N-komplemento (§12.2.1).

## 33.2.3. *Ke*-frazoj kiel komplemento

*Ke*-frazo povas roli kiel komplemento kun rolvorteto. Normale oni metas la rolvorteton antaŭ helpa *tio*:

- *Li vekiĝis **per tio, ke iu lin skuis**.* [FA1.217]
- *La esperantismo celas nur **al tio, ke ia taŭga kaj vivipova komprenilo inter la popoloj ekzistu**.* [OV.382]
- *La esenco de mia malfeliĉo konsistas **en tio, ke mi povis malmulte, ke mi nenion sufiĉe kapablis**.* [M.126]
- *Via patro neniam povis ekrigardi vin **sen tio, ke li batus sin en la bruston kaj ĝemus**.* [Rt.40]
- ***Anstataŭ tio, ke vi estis forlasita kaj malamata** [...], Mi faros vin fierindaĵo de la mondo.* [Jes.60]
- *Li ŝprucigas al la infanoj en la okulojn dolĉan lakton,* [...] *kiu tamen tute sufiĉas **por tio, ke ili plu ne povas teni la okulojn nefermitaj**.* [FA2.2]
- *Ne **por tio** mi estas ĉi tie, **ke mi alportadu manĝon al la loĝantoj**.* [M.10]
- *Tiam ŝi ekploris **pro tio, ke ŝi estas tiel malbela**.* [FA1.44]

Se la rolvorteto estas *pri*, oni normale forlasas ĝin (kaj la helpan *tio*):

- *La kontraŭuloj de tiuj ĉi ennovaĵoj denove nin kulpigus, **ke ni agas arbitre**.* [OV.165] *= ... kulpigus nin pri tio, ke ...*
- *Petu ŝin, **ke ŝi sendu al mi kandelon**.* [FE.20] *= Petu ŝin pri tio, ke ...*

Okaze oni forlasas ankaŭ *por tio* antaŭ *ke*-frazo:

- *Ŝi bone lin kovris, **ke li ne malvarmumu denove**.* [FA2.83] *= ... kovris por ke li ne malvarmumu denove.*
- *Tie estis unu riĉa virino, kiu retenis lin, **ke li manĝu ĉe ŝi**.* [Rĝ2.4] *= ... por ke li manĝu ĉe ŝi.*

Rimarku, ke la ĉefverbo ĉiam havas U-finaĵon en tiaj subfrazoj (§33.2.7).

### Rolvorteto rekte antaŭ *ke*-frazo

La rolvorteton *por* oni normale metas rekte antaŭ *ke*-frazo sen helpa *tio*. La plenan esprimon *por tio ke* oni tre malofte uzas. Oni uzas ankaŭ *anstataŭ* rekte antaŭ *ke*, kaj kelkfoje *malgraŭ*, *krom* kaj *sen*:

- *Jen prenu ankoraŭ du panojn kaj unu ŝinkon,* ***por ke vi ne bezonu malsati!*** FA2.70
- ***Por ke la malfeliĉo nin ne postkuru****, mi ĵetis al ĝi por repaciĝo la lastaĵon el mia havo, la arĝentan pelvon.* Rn.15
- *Ŝi tuj lavis sian kruĉon kaj ĉerpis akvon en la plej pura loko de la fonto kaj alportis al la virino, ĉiam subtenante la kruĉon,* ***por ke la virino povu trinki pli oportune****.* FE.15
- ***Anstataŭ ke ĉiu lernas diversajn lingvojn****, ĉiuj ellernadu unu saman lingvon.* FK.263
- *Li klopodis daŭrigi,* ***malgraŭ ke li estis tre laca****. Malgraŭ (tio) ke = kvankam* (§33.7).
- *Mi, mi konfesas, nenion pli postulus,* ***krom ke oni montru al mi sindonecon kaj estimon****.* Rz.34
- *Vi ne povas ĝin tuŝi,* ***sen ke ĝi rompiĝus****.*

Nur *por ke*, *malgraŭ ke*, *anstataŭ ke*, *krom ke* kaj *sen ke* estas ĝenerale akceptitaj. Sed nur malkutimeco estas argumento kontraŭ frazoj kiel: *Ni parolis,* ***pri ke*** *la prezoj ĉiam altiĝas. Oni argumentis,* ***kontraŭ ke*** *ili ekloĝu en la urbo. Li sukcesis eskapi,* ***pro ke*** *vi dormis. Tio okazis,* ***antaŭ ke*** *mi naskiĝis.* Malkutimeco estas tamen forta argumento. Oni ne senbezone esprimu sin en maniero tiel nekutima, ke oni eble ne estas komprenata. Prefere oni do uzu helpan *tio*: *pri tio ke*, *kontraŭ tio ke* k.t.p. Anstataŭ *antaŭ (tio) ke* kaj *post (tio) ke* oni uzas *antaŭ ol* kaj *post kiam* (§33.7). Anstataŭ *pro ke* oni uzu *pro tio ke*, *tial ke* aŭ *ĉar* (§33.6).

Komparu kun la uzo kaj neuzo de rolvortetoj antaŭ I-verboj: §27.5.

## 33.2.4. *Ke*-frazoj kiel priskribo

Ofte *ke*-frazo rolas kiel rekta priskribo. La priskribanta *ke*-frazo staras ĉiam post la priskribata vorto, kaj iel pliklarigas ties enhavon.

### Priskribo de O-vorto

- *De s-ro Bourlet mi ricevis <u>la sciigon</u>,* ***ke li ne volas publikigi la projekton en la "Revuo"****.* L1.320
- *Ŝi estis plena de <u>timo</u>,* ***ke la infano mortos****.* FA3.1
- *Li metis la <u>kondiĉon</u>,* ***ke oni ne instruu al ŝi la Kristanan religion****.* FA3.102
- *Kie mi havas la <u>garantion</u>,* ***ke mia granda laboro ne estos perdita****?* OV.272
- *"Mi faras al vi <u>donacon</u>,"* [...] *"****ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono****."* FE.15
- *Tio ĉi estis la unua <u>fojo</u>,* ***ke ŝi nomis ŝin sia filino****.* FE.17 Multaj uzas *kiam* anstataŭ *ke* en ĉi tiaj frazoj. Plej ofte *ke* estas pli taŭga, ĉar tia ĉi *ke*-frazo

ordinare ne montras, kiam okazis la fojo, sed klarigas la enhavon de la fojo.

### Priskribo de *tio, tia, tiel* kaj *tiom*

- *La tuta respondo de la virino konsistis nur en tio, **ke ŝi pli forte alpremis al la genuoj la kapon de la ploranta infano**.* [M.5]
- *Interne de ĝi* [= la kaverno] *flamis fajro tia, **ke oni povus rosti sur ĝi tutan bovon**.* [FA1.180]
- *Estis tia ventego, **ke la tegoloj deflugis de la tegmentoj**.* [FA1.77]
- *Ili ambaŭ estis tiel malagrablaj kaj tiel fieraj, **ke oni ne povis vivi kun ili**.* [FE.11]
- *Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, **ke mi devas fari al vi donacon**.* [FE.15]
- *Ŝi fariĝis tiel malaminda, **ke ŝia propra patrino ŝin forpelis de si**.* [FE.23]
- *Li estas tiel dika, **ke li ne povas trairi tra nia mallarĝa pordo**.* [FE.33]
- *Oni tiel malhelpis al mi, **ke mi malbonigis mian tutan laboron**.* [FE.33]
- *Ili trovis ĉe ili multe da havaĵo, vestoj, kaj multekostaj objektoj, kaj prenis al si tiom, **ke ili ne povis porti**.* [Kr2.20]
- *Li rakontis al ni tiom multe, **ke dum la tuta nokto mi sonĝis pri tio**.* [FA1.227]

### Priskribo de A-vorto aŭ E-vorto

- *Vi ne estas kulpa, **ke vi fariĝis tio, kio vi estas**.* [FA3.19] *= ... kulpa pri tio, ke ...*
- *Mi estas feliĉa, **ke mi vin akceptos**.* [LR.112] *= ... feliĉa pri tio, ke ...*
- *Ŝi estis tute certa, **ke tio estos plenumita**.* [FA3.125] *= ... certa pri tio ke ...*
- *Ili estis aŭdintaj, **ke la reĝo venos viziti**.* Principe la *ke*-frazo priskribas *aŭdintaj*, sed estas pli nature rigardi *estis aŭdintaj* kiel unu kunmetitan verbon. La *ke*-frazo estas objekto de tiu kunmetita verbo.
- *Kiel feliĉa mi estas, **ke mi ĝin scias**!* [BV.69]
- *Vidante, **ke ŝi estas tiel bela**, li demandis ŝin, kion ŝi faras tie ĉi tute sola.* [FE.21] *= Vidante tion, **ke ŝi estas tiel bela** ...*
- *Dirante, **ke via traduko ne estas sen certaj bonaj flankoj**, mi diris la veron.* [M.135] *= Dirante tion, **ke via traduko** ...*
- *Ĉion mi permesis al vi escepte, **ke vi faru tion ĉi**. = ... kun la escepto, **ke vi faru tion ĉi**.*
- *Li faris tion spite **ke oni malpermesis**.* La esprimo *spite ke* estas simila al *kvankam* kaj *malgraŭ (tio) ke* (§33.7).

### Perverba priskribo

*Ke*-frazo povas esti perverba priskribo de O-vorto aŭ simile:

- *La vero estas, **ke mi amas vin**.*
- *La esenco* [de la sciigoj] *estis, **ke al Kristino estas bone**.* [FA3.91]

Kelkfoje oni uzas helpan *tio*:

- *La <u>dua kulpigo</u>, kiun ni ofte devas aŭdi, estas **tio, ke ni esperantistoj estas malbonaj patriotoj**.* OV.382

### 33.2.5. Motivantaj kaj rezultaj *ke*-frazoj

Speciala zamenhofa frazturno estas *ke*-frazo, kiu montras la kaŭzon por diri la ĉeffrazon. La ĉeffrazo estas normale demanda aŭ ekkria frazo:

- *Kio do estas al vi, **ke vi tiel ploras** [...]?* FA1.227 *= Kio do estas al vi? Mi demandas tion, ĉar vi tiel ploras.*
- *Kien vi volas iri, **ke vi metis sur vin la festan surtuton**?* FA3.96 *= Kien vi volas iri? Mi demandas tion, ĉar vi metis sur vin la festan surtuton.*
- *Kia malsaĝulo mi estis, **ke mi volis reiri en la kaĝon**!* Rt.30 *= Kia malsaĝulo mi estis! Mi nomas min tiel, ĉar mi volis reiri en la kaĝon.*

Alia speciala zamenhofa frazturno estas *ke*-frazo, kiu montras sekvon aŭ rezulton. *Ke* tiam signifas "tiel ke, kun la rezulto ke, kio kaŭzis ke" aŭ simile:

- *Clemency Newcome puŝiĝis nun je la tablo, **ke ĉiuj teleroj kaj tasoj ekkrakis**.* BV.29
- *Jen io min alforĝis al la loko, **ke mi ne povas forkuri**!* Rt.105

Oni povus enŝovi *tiel* en la ĉeffrazon, sed la pli simpla zamenhofa dirmaniero estas tre eleganta, kaj meritas plian uzadon.

### 33.2.6. Forlaso de *ke*

Kelkfoje oni forlasas *ke* antaŭ subfrazo:

- *Mi diras al vi, ŝi ricevos.* H.143 *= Mi diras al vi, **ke** ŝi ricevos.*
- *Li volas iri hejmen, li diris. = Li diris, **ke** li volas iri hejmen.*
- *La vetero baldaŭ malboniĝos, ŝajnas. = Ŝajnas, **ke** la vetero baldaŭ malboniĝos.*

Forlaso de *ke* okazas preskaŭ nur en nerekta parolo (§33.8). Komparu ankaŭ kun komentofrazoj kaj citaĵoj (§32.2).

### 33.2.7. Verboformoj en *ke*-frazoj

En subfrazoj kun *ke* povas esti malfacile elekti verboformon, ĉar ofte la *ke*-fraza verbo ne memstare esprimas ion. La signifo dependas de la ĉeffrazo. Ne estas eble doni absolutajn regulojn, ĉar la signifovariantoj estas tro multaj. La ĉi-postaj principoj estas do nur ĝeneralaj konsiloj. Oni ĉiam memoru, ke plej grava estas la efektiva ideo, kiun oni volas esprimi.

#### Memstarigo de frazo

Por vidi, kian verboformon oni uzu en *ke*-frazo, oni povas provi memstarigi la *ke*-frazon. Oni disigu ĝin de ĝia ĉeffrazo kreante du memstarajn frazojn. Se tia disigo estas facile farebla, oni simple elektu por la *ke*-frazo la saman verboformon, kiun ĝi havus, se ĝi aperus memstare.

*Ke*-frazo povas ekz. esti redonado de ies diro, penso, demando, ordono aŭ simile. Tio nomiĝas nerekta parolo (§33.8). La memstarigita frazo estas tiam la originaj vortoj:

- *Mi diris, ke li **venos**. → "Li **venos**." Tion mi diris.*
- *Mi diris, ke li **venu**. → "Li **venu**!" Tion mi diris.*
- *Baldaŭ ni vidis, ke ni **trompiĝis**.* [FE.40] *→ "Ni **trompiĝis**." Tion ni baldaŭ vidis.*

Ankaŭ se ne temas pri nerekta parolo, oni uzu la saman verboformon, kiun havus memstara frazo:

- *Mi estas feliĉa, ke mi vin **akceptos**.* [LR.112] *→ Mi vin **akceptos**. Mi estas feliĉa pro tio.*
- *Tio ĉi estis la unua fojo, ke ŝi **nomis** ŝin sia filino.* [FE.17] *→ Ŝi **nomis** ŝin sia filino. Estis la unua fojo de tio.*
- *Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke mi **devas** fari al vi donacon.* [FE.15] *→ Mi **devas** fari al vi donacon. La kialo estas, ke vi estas tiel bela ...*
- *Li metis la kondiĉon, ke oni ne **instruu** al ŝi la kristanan religion.* [FA3.102] *→ Oni ne **instruu** al ŝi la kristanan religion. Tiun kondiĉon li metis.*

Sed ofte *ke*-frazo ne povas facile memstariĝi, ĉar la ligo al la ĉeffrazo estas tro forta. Se oni disigas la frazojn, la senco malaperas aŭ aliiĝas. Tiam oni devas sekvi la ĉi-postajn principojn.

### *Ke*-frazoj por celo, opinio aŭ eblo

La signifo de *ke*-frazo ofte dependas de la rilato al la ĉeffraza verbo. La *ke*-frazo povas montri ekz. celon, opinion aŭ eblon rilate al la ĉeffrazo. Tiam oni ofte uzu volan modon, U-modon, en la *ke*-frazo, sed ne ĉiam.

### Celo

*Ke*-frazo povas montri celon de la ĉeffraza ago. Normale temas pri io, kion oni volas atingi, sed povas ankaŭ esti io, kion oni volas eviti. En tiaj *ke*-frazoj oni uzas preskaŭ ĉiam U-formon de la verbo. Oni ofte ankaŭ povas uzi I-verbon anstataŭ *ke*-frazo. Ĉe multaj el la sekvontaj verboj tio estas eĉ la pli kutima esprimomaniero.

*Ke*-frazoj estas normale celaj, kiam la ĉeffrazo enhavas verbon kiel: *voli*, *deziri*, *ordoni*, *admoni*, *postuli*, *peti*, *proponi* kaj *konsili*. Similan signifon havas frazoj kun *bezoni* kaj *esti necese*:

- *Mi <u>volas</u> ke vi tien **iru**.* [FE.19]
- *Mi <u>volas</u>, ke tio, kion mi diris, **estu** vera.* [FE.24]
- *Nia plejmoŝta kaj plej favorkora imperiestro <u>deziras</u>, ke vi **kantu** antaŭ li!* [FA2.26]
- *Mi <u>deziris</u>, ke* [...] *mi neniam **estu** fariĝinta direktoro.* [FA4.200] La parolanto antaŭe deziris, ke li fariĝu direktoro, kaj tiel ja okazis. Sed li pentis, kaj volis, ke tio ne estu okazinta.

- *Ordonu al li, ke li ne **babilu**.* [FE.20]
- *Oni admonas min, ke mi ne **miksu** min en la aferojn.* [L2.317]
- *Oni postulas, ke mi nepre **ĉesu** fumi.* [L2.297]
- *Petu ŝin, ke ŝi **sendu** al mi kandelon.* [FE.20]
- *Oni afable proponis al ŝi, ke ŝi **restu** en la palaco kaj **vivu** en lukso kaj ĝojoj.* [FA2.66]
- *Mi konsilus al tiuj sinjoroj, ke anstataŭ silko kaj puntoj ili **prenu** en siajn manojn plugilon, hakilon, martelon, trulon aŭ ion similan.* [M.87]
- *Estas necese, ke la esperantistoj antaŭe **unuiĝu** kaj **organiziĝu**.* [L1.129]
- *Ĉu Vi bezonas, ke mi **resendu** al Vi la protokolaron de s-ro Schneeberger?* [L1.213]

Multaj el tiuj ĉi subfrazoj estas ankaŭ klarigeblaj kiel nerekta parolo (§33.8).

*Ke*-frazoj estas ofte celaj ankaŭ post *devigi*, *trudi*, *lasi*, *(mal)permesi*, *(mal)ebligi*, *(mal)helpi*, *zorgi*, *eviti*, *atenti*, *gardi (sin)* k.s. Tiel estas ankaŭ ĉe *por ke*, kaj ofte ĉe *tiel ke*. En tiaj okazoj la *ke*-frazo montras rezulton, kiun la ĉefverba ago celas kaŭzi:

- *Vi devigis ilin, ke ili **estu** por vi sklavoj kaj sklavinoj.* [Jr.34]
- *Li trudis al mi, ke mi **faru** tion.*
- *Ĉu vi pensas, ke ŝi volus naĝi aŭ lasi, ke la akvo **fermiĝu** super ŝi?* [FA2.39] Post *lasi* oni uzas preskaŭ ĉiam I-verbon anstataŭ subfrazo: *... lasi la akvon fermiĝi ...*
- *Lia helpo ebligos, ke ni **partoprenu** en la kongreso.*
- *La soldatoj malebligis, ke li **flegu** sian fraton.* Li do ne povis flegi la fraton. Rimarku, ke oni ne uzas *ne* en la subfrazo. Se oni dirus *... malebligis, ke li **ne** flegu sian fraton*, tio signifus, ke li ja flegis la fraton, ĉar la soldatoj devigis lin fari tion.
- *Helpu al mi, ke oni min ne **pendigu**!* [FA1.12]
- *Nenio malhelpas, ke mi **povu** plenumi la deziron de persono, kiu en alia tempo estis afabla por ni.* [M.96] Mi do ja povas tion plenumi. Rimarku, ke oni ne uzas *ne* en la subfrazo. Vidu la ĉi-antaŭan ekzemplon kun *malebligi*.
- *Ĉu vi permesas, sinjorino, ke mi vin **akompanu**?* [M.167]
- *Se ĝi estas malbona, kiu do malpermesas, ke la esperantistoj mem ĝin **reorganizu**?* [L2.147] Efektive neniu tion malpermesas. Ili do ja rajtas ĝin reorganizi. Rimarku, ke oni ne uzas *ne* en la subfrazo. Vidu la ĉi-antaŭan ekzemplon kun *malebligi*.
- *Tien ĉi alnaĝis la virineto de maro kun la bela princo, kuŝigis lin sur la sablo kaj zorgis, ke lia kapo **kuŝu** alte en la varma lumo de la suno.* [FA1.90]
- *Li sukcesis eviti, ke ni **estu** kaptitaj.*
- *Atentu, ke vi ne **falu**!*
- *Gardu vin, ke vi ne **ekdormu**!*

- *Por ke la malfeliĉo nin ne **postkuru**, mi ĵetis al ĝi por repaciĝo la lastaĵon el mia havo, la arĝentan pelvon.* [Rn.15]
- *Fariĝis vespero, kaj estis tro malproksime, por ke oni **povu** antaŭ plena noktiĝo atingi la urbon aŭ veni returne hejmen.* [FA1.14]
- *Ĝi* [= la domo] *estis tro kaduka, por ke oni **povu** lasi ĝin stari.* [FA3.23]

Sed se *ke*-frazo montras efektivan faktan rezulton, oni uzu la realan modon:

- *Oni tiel malhelpis al mi, ke mi **malbonigis** mian tutan laboron.* [FE.33] La malbonigado estis efektiva rezulto de la malhelpado. Ĉu tio estis ankaŭ celo aŭ volo de la malhelpantoj, tion la frazo ne montras.
- *Li atentis tiel zorge, ke li **povis** kapti ĉiujn el ili.*
- *Li ŝprucigas al la infanoj en la okulojn dolĉan lakton,* [...] *kiu tamen tute sufiĉas por tio, ke ili plu ne **povas** teni la okulojn nefermitaj.* [FA2.2] Estas jam reala fakto, ke ili ne povas teni la okulojn nefermitaj.

Se temas samtempe pri celo aŭ volo, kaj pri la fakto ke la rezulto realiĝis, oni uzu aŭ volan modon, aŭ realan modon, depende de tio, kiu nuanco ŝajnas pli grava:

- *Tio ebligis, ke mi **ĉeestas/ĉeestu**.* Mi efektive ĉeestas pro tio.

Ĉe *kaŭzi* kaj *fari* neniam temas pri celo, sed ĉiam pri fakta rezulto:

- *Vi kaŭzis tion, ke mi **devas** vin malestimi!* [FA2.19]
- *La sorto faris, ke ni ambaŭ **kuŝis** sub unu tendo.* [Rt.46]

## Opinio

Iafoje la ĉeffrazo montras ies opinion aŭ sintenon rilate al la *ke*-frazo. En tiaj frazoj oni uzu realan modon, se estas opinio nur pri reala afero. Oni uzu volan modon, se temas pri nerealaĵo, kiun oni deziras aŭ ne deziras, aŭ se temas pri ĝenerala principo:

- *Ĉu vi, kara Mario, trovas ĝin konvena, ke juna virino* [...] ***restu** la tutan tagon ĉe la sama tablo kun kelke da junaj viroj?* [M.88] ≈ *Ĉu vi volas, ke tiel **estu**?*
- *Estis ne dece, ke mi **ridis**.* [FA2.147] La ridado fakte okazis, kaj tio estis nedeca.
- *Estas pli bone ke ni tie ĉi **manĝu** kaj **iru** en la urbon vespere.* [BV.84]
- *Ĝi* [= la letero] *certe meritis, ke oni ĝin **rigardu**.* [FA4.130]
- *Mi konsentas, ke vi **estas** prava. = Mi konsentas pri la fakto, ke vi estas prava.*
- *Ĉu vi konsentas, ke ni **vojaĝu** kune?* [FA1.64] ≈ *Ĉu vi volas, ke ni **vojaĝu** kune?*
- *Ĉu Vi preferus, ke mi **kaŝu** antaŭ Vi mian opinion?* [L2.222]
- *Mi esperas ke vi **plenumos** mian peton kiel eble plej baldaŭ.* [OV.487] ≈ *Mi atendas kun fido, ke vi efektive plenumos mian peton ...* Normale oni uzu la realan modon post *esperi*, sed oni povus eble uzi U-modon, se oni

volas aldoni nuancon de volo: *Mi esperas, ke vi* ***venu****.* = *Mi esperas kaj volas, ke vi* ***venu****.*

- *Mi timas, ke mi ĝin jam ne* ***trovos****.* [FE.20] = *Mi timas, ke estas fakto, ke mi ĝin jam ne trovos.*

Zamenhof iafoje uzis nean U-verbon post *timi* en stranga maniero: *Ŝi tamen ne ellasis la manon de Marta el siaj manoj, kvazaŭ ŝi timus, ke tiu virino* ***ne foriru*** *de ŝi sen ricevo de konsilo kaj helpo.* [M.59] = *... kvazaŭ ŝi timus pensante, ke tiu virino* ***ne foriru*** *...* Tia dirmaniero estas evitinda, ĉar miskomprenebla. Diru ekz.: *... kvazaŭ ŝi timus, ke tiu virino* ***forirus*** *...*

### Eblo

Iafoje la ĉeffrazo montras, ke la *ke*-frazo estas ebla aŭ neebla. Se temas pri simpla konstato de fakta eblo, oni uzu la realan modon:

- *Estas eble, ke li* ***alvenos*** *morgaŭ.*
- *Neeble estas, ke ni denove* ***amos*** *tiun, kiun ni vere ĉesis ami.*

Se temas pri subkomprenata ago, kiu iel kreis la eblon, oni uzu volan modon. Tiam *estas eble* signifas "estas ebligite": *Fine estas eble, ke mi iom* ***ripozu****.*

### Imagaj *ke*-frazoj

Iafoje *ke*-frazo dependas de ia kondiĉo. Se tia *ke*-frazo montras ion fantazian, la verbo estu en imaga modo, US-modo. Se la afero eble estas reala, oni uzu la realan modon. La kondiĉo povas iafoje esti subkomprenata:

- *Mi estas certa, ke li* ***venus****, se li povus.* Li ne povas.
- *Mi estas certa, ke li* ***venos****, se li povos.* Eble li povos.
- *Flamis fajro tia, ke oni* ***povus*** *rosti sur ĝi tutan bovon* [se oni havus tutan bovon por rosti]. [FA1.180]

Ankaŭ senkondiĉaj *ke*-frazoj povas montri ion pure imagan:

- *Ne ekzistas eĉ la plej malgranda kaŭzo por timi, ke* ***aperus*** *ia nova lingvo, kiu* ***elpuŝus*** *Esperanton.* [FK.290]

## 33.3. Demandaj subfrazoj

Se subfrazo estas demando, ĝi ne komenciĝas per *ke*, sed per *ĉu* (§22.2) aŭ per KI-vorto (§13.1). Demandaj subfrazoj povas roli en la samaj frazroloj kiel *ke*-frazoj (§33.2) (subjekto, objekto, priskribo kaj komplemento), kaj ĝenerale validas la samaj reguloj. Oni povas ofte uzi helpan *tio* (§33.2.1), sed ordinare tio ne estas necesa.

- *Al li fariĝis dube,* ***ĉu la fera stango estas ŝovita antaŭ la pordon****.* [FA3.140] La *ĉu*-demando estas subjekto de *fariĝis*. (*Al li tio fariĝis duba.*) Oni uzas E-finaĵon en *dube*, ĉar la subjekto estas subfrazo. Oni povus uzi helpan *tio*: *Al li tio, ĉu la fera stango estas ŝovita antaŭ la pordon, fariĝis duba.*
- ***Kion ni nun faru****, estas demando tre malfacila.* La KI-demando rolas kiel subjekto de *estas*.

- *Li* [...] *provis,* ***ĉu la pordo estas nefermita.*** [BV.77] La *ĉu*-demando estas objekto de *provis*. Oni povus uzi helpan *tio*: *Li provis tion, ĉu la pordo estas nefermita.*
- *Diri jam nun kun plena certeco,* ***ĉu mi povos veni****, nun estas ankoraŭ ne eble.* [L2.236] La *ĉu*-demando estas objekto de *diri*.
- *Ŝi ne sciis,* ***ĉu ŝi nur sonĝis*** *aŭ* ***ĉu tio estis efektivaĵo.*** [FA1.163] Estas du objektaj *ĉu*-demandoj ligitaj per *aŭ*.
- ***Ĉu tio estas roso aŭ larmoj, tion*** *neniu povis vidi.* [FA1.164] La *ĉu*-demando estas objekto kun helpa *tio*.
- *Mi montris al la infano,* ***kie kuŝas ĝia pupo****.* [FE.18] La demando estas objekto de *montris*.
- *Ŝi pripensis,* ***kiom kostos al ŝi la nokta restado****.* [FA4.115] La demando estas objekto de *pripensis*.
- *Ĉu vi ne scias,* [...] ***kiom estis da mortigitoj****?* [Rt.64] La subfraza demando estas objekto de *scias*.
- *Mi ne scias,* ***ĝis kiam ili restos ĉi tie****.* La demando estas objekto de *scias*.
- *Li preferis antaŭe sendi alian personon, por vidi,* ***kiel la afero staras****.* [FA1.108] La demando estas objekto de *vidi*.
- ***Kiel longe ni estis en la malliberejo, tion*** *mi ne scias.* [FA1.229] La demando estas objekto kun helpa *tio*.
- ***El tio povas elveni****, la diablo scias,* ***kio****.* [Rz.9] La subfrazo estas disigita, sed rolas kiel objekto. = *La diablo scias,* ***kio el tio povas elveni****.*
- <u>*Mia sola demando al vi*</u> *estas,* ***ĉu vi amas min****.* La demando estas perverba priskribo de la subjekto.
- <u>*La demando*</u> *estas,* ***kiel longe ni restu ĉi tie****?* La demando estas perverba priskribo de la subjekto.
- *Oni proponis al ŝi la* <u>*elekton*</u>*,* ***ĉu ŝi preferas vidi min morti aŭ fariĝi amaĵistino de la princo****.* [Rt.88] La demando estas rekta priskribo de la vorto *elekton*.
- *Li faris al mi la* <u>*demandon*</u>*,* ***ĉu mi bone fartas****.* La demando estas rekta priskribo de la vorto *demandon*.

## Demandaj subfrazoj en rolo, kiu bezonas rolvorteton

Demanda subfrazo ankaŭ povas havi tian frazrolon, kiu principe bezonas rolvorteton, ekz. *pri*. Tradicie oni en tiaj okazoj uzas helpan *tio* post la rolvorteto. Sed se la bezonata rolvorteto estas *pri*, oni ofte anstataŭe simple forlasas (subkomprenas) la vorteton *pri*, se la frazo ne fariĝas tro malklara:

- *Mi transiros al la klarigo* ***de tio, kiel mi solvis la supre diritajn problemojn****.* [FK.232] La demando estas rekta priskribo de *la klarigo* pere de helpa *tio*.
- *La akrido* [...] *meditis* ***pri tio, kiel strange iras la aferoj en la mondo****.* [FA2.104] La demando rolas kiel *pri*-komplemento kun helpa *tio*.

- <u>*La demando*</u> ***pri tio, kia estos la formo de tiu lingvo****, estas por mi afero negrava.*[L1.321] La demando estas rekta priskribo de *la demando* pere de helpa *tio*.
- *Mi dubas,* ***ĉu vi estas feliĉa****.*[FE.26] La demando rolas kiel *pri*-komplemento. = *Mi dubas* ***pri tio, ĉu ...*** Sed *pri tio* estas forlasita.
- *Nun mi venis, por informi vin,* ***kio estos kun via popolo en la estonta tempo****.*[Dn.10] La demando estas *pri*-komplemento, sed *pri tio* estas forlasita: *... por informi vin* ***pri tio, kio estos*** *...*

Tradicie *krom* kaj *anstataŭ* eĉ povas aperi rekte antaŭ demanda subfrazo sen helpa *tio*, kvankam praktike tiaj frazoj estas maloftaj:

- *Li demandis al mi ĉion imageblan* ***krom (tio), ĉu mi amas lin****.*
- *Ŝi demandis pri mia nomo* ***anstataŭ (tio), kial mi estas tie****.*

Uzo de sola *pri* sen helpa *tio* antaŭ demanda subfrazo, kiu komenciĝas per *kiel*, estas netradicia, sed nuntempe tamen relative ofta. Tia uzo ne kaŭzas problemojn. Simile akceptebla estas tia uzo antaŭ aliaj E-vortecaj KI-vortoj: *pri kiam ..., pri kiom ..., pri kial ..., pri kie(n)...*:

- *Jen klarigoj* ***pri (tio), kiel oni povas aliĝi al la kongreso****.* Tradicie oni ĉiam uzis helpan *tio* en tiaj ĉi frazoj.
- *Temas nun* ***pri (tio), kiel ni solvu la problemon plej bone****.*
- *Mi interesiĝas* ***pri (tio), kial vi venis al la kongreso****.*
- *Ni ricevis informojn* ***pri (tio), kie estas la akceptejo kaj la ĉefaj salonoj****.*

Sed tia uzo de *pri* estas multe malpli ofta ĉe demandaj subfrazoj, kiuj uzas O-vortecan aŭ A-vortecan KI-vorton (*kio*, *kiu*, *kia* kaj *kies*), kredeble ĉar en tiaj okazoj *pri* ankaŭ povas rekte rilati al la KI-vorto (ne nur al la tuta demanda subfrazo), kio povas kaŭzi momentan konfuzon pri la celita senco. Simile malofta estas tia uzo de *pri* rekte antaŭ *ĉu*-demanda subfrazo. Ordinare oni tiam uzas helpan *tio*: *Mi interesiĝas* ***pri tio, ĉu vi jam aliĝis al la kongreso****.*

La nuntempe pli kaj pli ofta uzo de *pri* rekte antaŭ (iaj) demandaj subfrazoj estas parto de la lingva evoluo menciita en la sekcio pri I-verboj (§27.5). Vidu ankaŭ la klarigojn pri rolvortetoj antaŭ *ke*-frazoj (§33.2.3).

## Demandaj kaj rilataj KI-subfrazoj

Subfrazo, kiu komenciĝas per KI-vorto, povas esti demanda aŭ rilata (§33.4). Iafoje la sama formo povas esti dusenca: *Ŝi sciigis al li,* ***kion la libro enhavas****.* Se la subfrazo estas demanda, ŝi diris al li la respondon al la demando: *Kion la libro enhavas?* Eble ŝi tiam diris responde simple: *Ĝi enhavas lecionojn pri matematiko.* Se anstataŭe la subfrazo estas rilata (kun subkomprenata *tion*, §33.4.3), tiam ŝi instruis al li tiujn regulojn de matematiko, kiujn la libro enhavas, sed ŝi eble ne diris, ke tiu libro enhavas tiujn regulojn.

Se la ĉeffrazo enhavas helpan *tio*, demanda subfrazo povas esti eĉ pli simila al rilata subfrazo, kaj ofte la senca diferenco povas esti malgranda kaj subtila: *Mi parolas pri tio, kion mi sentas.* La subfrazo povas esti rilata. Tiam la

tuta frazo signifas pli-malpli: *Mi parolas pri tiuj sentoj, kiujn mi havas.* En tia okazo *tio* reprezentas la saman sencon, kiun havas la sekva rilata vorto *kion*. Sed tiu sama frazo ankaŭ povas signifi: *Mi parolas pri la jena demando: Kion mi sentas?* Tiam la subfrazo estas demanda. La helpa vorto *tio* reprezentas la tutan postan demandan subfrazon. La vorto *kion* ne aparte rilatas al la antaŭa *tio*. Oni vidas tion plej klare, se oni enmetas alian demandon: *Mi parolas pri tio, ĉu mi havas sentojn.* (= *Mi parolas pri la jena demando: Ĉu mi havas sentojn?*) Aŭ: *Mi parolas pri tio, kial mi havas tiom da sentoj.* La demanda subfrazo povas komenciĝi per *ĉu* aŭ per iu ajn KI-vorto, ne nur per la vorto *kio(n)*.

### *Ĉu* kaj *se*

En iuj lingvoj oni uzas en subfrazoj la saman vorton por *ĉu* kaj por *se*. En Esperanto oni devas distingi. *Ĉu* montras demandon. *Se* montras kondiĉon (§33.5). La signifodiferenco estas tre granda:

- *Morgaŭ li diros,* ***ĉu*** *li venos.* ≈ *Morgaŭ li diros "jes, mi venos" aŭ "ne, mi ne venos".* La *ĉu*-demando estas objekto de *diros*. = *Morgaŭ li diros la respondon al la demando, ĉu li venos.*
- *Morgaŭ li diros,* ***se*** *li venos.* = *Morgaŭ li diros (ion), sed tio okazos nur se li venos.* La *se*-frazo estas kondiĉa komplemento.

## 33.4. Rilataj subfrazoj

Tabelvorto je KI (§13.1) povas enkonduki subfrazon sen demanda signifo. Normale tia KI-vorto reprezentas ion en la ĉeffrazo. Tiajn KI-vortojn oni nomas rilataj, ĉar ili montras rilaton inter la subfrazo kaj la ĉeffrazo, kaj sekve tiajn subfrazojn oni nomas rilataj. Rilata KI-vorto staras (normale) komence de la rilata subfrazo kiel frazenkondukilo.

La plej grava rilata KI-vorto estas *kiu*. Tial multaj detaloj pri rilataj subfrazoj estas klarigataj nur en la klarigoj pri *kiu* (§33.4.1.1).

Legu ankaŭ pri la diferenco inter demandaj kaj rilataj subfrazoj en §33.3.

### 33.4.1. Rilataj *kiu, kio* kaj *kies*

Subfrazo povas roli kiel rekta priskribo de O-vorto aŭ O-vorteca vorteto. Se la priskribata afero mem rolas ankaŭ en la subfrazo, tiam oni uzas rilatan *kiu* (§33.4.1.1), *kio* (§33.4.1.2) aŭ *kies* (§33.4.1.3) por enkonduki la subfrazon. *Kiu*, *kio* aŭ *kies* reprezentas la priskribatan aferon en la subfrazo. La subfrazo staras plej ofte tuj post tio, kion ĝi priskribas.

#### 33.4.1.1. Rilata *kiu*

- <u>*La fera bastono*</u>*,* ***kiu kuŝis en la forno****, estas nun brule varmega.* [FE.31] La *kiu*-frazo estas rekta priskribo de la vorto *bastono*. La tuto estas kunigo de du frazoj: *La fera bastono, estas nun brule varmega.* + *La fera bastono kuŝis en la forno.* La sama bastono rolas en ambaŭ frazoj. En la subfrazo oni uzas rilatan *kiu* por reprezenti la bastonon. Oni povas anstataŭe uzi participan priskribon: <u>*La fera bastono*</u> ***kuŝinta en la forno*** *estas nun brule varmega.*

- *En unu vilaĝo loĝis* <u>*du viroj*</u>*,* ***kiuj ambaŭ havis la saman nomon****.* [FA1.13] *En unu vilaĝo loĝis du viroj. + La du viroj havis la saman nomon.* Oni uzas *kiuj*, ĉar ĝi reprezentas multe-nombran vorton.
- *Ili prenis* <u>*la monon*</u>*,* ***kiun Johano donis al ili****.* [FA1.63] *= Ili prenis la monon. + Johano donis al ili la monon.* (*= Ili prenis la monon donitan al ili de Johano.*) Oni uzas *kiun* kun N-finaĵo, ĉar ĝi rolas kiel objekto en la subfrazo.
- *Ŝi estis ja la plej bela* <u>*knabino*</u>*,* ***kiun li iam vidis****.* [FA1.53] La frazparto *la plej bela knabino* rolas kiel perverba priskribo (sen N-finaĵo) en la ĉeffrazo. En la rilata subfrazo oni tamen uzas *kiun* kun N-finaĵo, ĉar ĝi tie rolas kiel objekto.
- *Ekzistas ankoraŭ* <u>*aliaj*</u>*,* ***pri kiuj ni ne parolos****.* [FK.278] *Ekzistas ankoraŭ aliaj. Pri ili ni ne parolos.* Oni uzas *pri* antaŭ *kiuj*, ĉar ĝi rolas kiel *pri*-komplemento en la subfrazo.
- *Li estis rigardata kiel* <u>*vigla maljuna sinjoro*</u>*,* ***ĉe kiu servi estas afero nur honora kaj profita****.* [FA4.177] *= Li estas rigardata kiel vigla maljuna sinjoro. + Servi ĉe la vigla maljuna sinjoro estas afero nur honora kaj profita. Kiu* estas *ĉe*-komplemento de *servi*.
- *De tie oni iris en* <u>*ĉambron*</u>*,* ***la muroj de kiu estis kovritaj per porka ledo****. = De tie oni iris en ĉambron. + La muroj de la ĉambro estis kovritaj per porka ledo. De kiu* estas poseda priskribo de *la muroj* kaj devas stari post *la muroj*. Ĉi tiaj subfrazoj estas tre maloportunaj, ĉar *de kiu* staras tro longe for de la komenco de la subfrazo. La subfrazo do ne havas klaran frazenkondukilon. Por eviti tion oni plej ofte uzas *kies* (§33.4.1.3) anstataŭ *de kiu(j)*: *De tie oni iris en* <u>*ĉambron*</u>*,* ***kies muroj estis kovritaj per porka ledo****.* [FA2.145]

### *Kiu* rilate al alia tabelvorto

Ofte la priskribata vorto en la ĉeffrazo estas *tiu* aŭ alia tabelvorto je U:

- *Riĉa estas* <u>*tiu*</u>*,* ***kiu ŝuldas al neniu****.* [PE.734]
- *La de longe pasintaj tempoj ĉiam havas grandan ĉarmon por* <u>*tiuj*</u>*,* ***al kiuj la novaj tempoj alportis nenion krom larmoj kaj doloro****.* [M.147]
- *Mi nun havas tie ĉi preskaŭ* <u>*neniun*</u>*,* ***al kiu mi povus konfidi****.* [BV.67]
- <u>*Ĉiun*</u>*,* ***kiu eniros en la domon****, oni mortigu.* [Kr2.23]

Ofte O-vorto, kiu estas priskribata de rilata *kiu*-frazo, havas *tiu* kiel difinilon antaŭ si. *Tiu* emfazas la rilaton al la *kiu*-frazo:

- *Ŝi kisis* <u>*tiun manon*</u>*,* ***kiu ankoraŭ antaŭ nelonge kruele batis ŝian infanon****.* [M.198] *= Ŝi kisis tiun manon. + Tiu mano ankoraŭ antaŭ nelonge kruele batis ŝian infanon.*
- *Ŝi* [...] *kantadis* <u>*tiujn kantojn*</u>*,* ***kiujn ŝi en aliaj cirkonstancoj neniam kantis****.* [FA1.226] *= Ŝi kantadis tiujn kantojn. + Tiujn kantojn ŝi en aliaj cirkonstancoj neniam kantis.*
- *Post duonhoro* [...] *ŝi ankaŭ malsupreniros per* <u>*tiu ŝtuparo*</u>*,* ***per kiu nun ŝi supreniras****.* [M.19]

*Kiu*-frazo povas ankaŭ priskribi tabelvorton je A, kiu rolas O-vortece:

- *Unuj servas por ornamo, kaj aliaj por manĝo, ekzistas ankaŭ tiaj, **kiuj estas tute superfluaj**.* [FA3.19] Oni povus diri, ke O-vorto estas subkomprenata: *... ekzistas ankaŭ tiaj kreskaĵoj, kiuj estas* ... (en la kunteksto estas evidente, ke temas pri diversaj kreskaĵoj).

Oni povas ankaŭ uzi rilatan *kia* (§33.4.2) por priskribi *tia*, se temas klare pri eco.

### *Kiu* rilate al persona pronomo

Rilataj *kiu*-frazoj ankaŭ povas priskribi personan pronomon:

- *Ŝi hontis, ke ŝi, **kiu estas tiel elegante vestita**, havas kiel patrinon tian almozulan virinon, kiu kolektas lignon.* [FA4.92]
- *Sed vin, **kiuj forlasis la Eternulon, forgesis Mian sanktan monton, aranĝas tablon por la Feliĉo, kaj faras verŝon por la Destino** – vin Mi destinos por la glavo.* [Jr.21]
- *Al Vi, **kiu kreas**, al Vi, **kiu reĝas**, Hodiaŭ ni preĝas.* [FK.439]

### Malfacile disigeblaj frazoj

Ofte estas malfacile disigi rilatan *kiu*-frazon de la ĉeffrazo, ĉar la signifo dependas de ambaŭ frazoj kune:

- *Ŝi prenis la plej belan arĝentan vazon, **kiu estis en la loĝejo**.* [FE.19] = *Ŝi prenis la plej belan arĝentan vazon. + La arĝenta vazo estis en la loĝejo.* La du apartigitaj frazoj tre malbone esprimas la celitan sencon. La *kiu*-frazo estas bezonata por limigi la signifon de la frazparto *la plej belan arĝentan vazon*.
- *Ĉiu, **kiu ŝin vidis**, povis pensi, ke li vidas la patrinon.* [FE.11] Se oni disigas, la senco perdiĝas: *Ĉiu povis pensi, ke li vidas la patrinon. + Ĉiu ŝin vidis.* Ne ĉiu tiel pensis. Ne ĉiu ŝin vidis.

Iuj ne metas komojn antaŭ (kaj post) *kiu*-frazo necesa por la signifo de la tuta frazo. Pri tio tamen ne ekzistas reguloj. Oni povas ĉiam meti komojn.

### Malproksimaj *kiu*-frazoj

Rilata *kiu*-frazo normale staras tuj post la priskribata vorto, sed iafoje en alia pozicio, ekz. en la komenco de la tuta frazo. Tiam la priskribata vorto ordinare estas *tiu* aŭ havas *tiu* antaŭ si:

- ***Kiun malĝojo ne turmentis**, tiu ĝojon ne sentas.* [PE.497] = *Tiu, kiun malĝojo ne turmentis, ne sentas ĝojon.*
- ***Kiu mem sin laŭdas**, tiun neniu aplaŭdas.* [PE.1216] = *Neniu aplaŭdas tiun, kiu mem sin laŭdas.*
- ***Kiu volas perfektiĝi en Esperanto**, al tiu mi rekomendas la diversajn lernolibrojn kaj vortarojn.* [FAnt.46] = *Al tiu, kiu volas perfektiĝi en Esperanto, mi rekomendas ...*

- *Nur* <u>*tiujn*</u> *vi povas manĝi el ĉiuj moviĝantoj,* ***kiuj havas flugilojn kaj iras kvarpiede****.* [Lv.11] *= El ĉiuj moviĝantoj vi povas manĝi nur tiujn, kiuj havas flugilojn ...*
- *La franca lingvo videble estis* <u>*tiu*</u> [scio] *el ŝiaj scioj,* ***de kiu ŝi esperis plej multe****.* [M.24]

Sola *tiu* estas tamen iafoje subkomprenata (§33.4.3) en ĉi tiaj frazoj.

*Tiu* antaŭ O-vorto povas helpi montri, al kiu vorto la *kiu*-frazo rilatas, se la *kiu*-frazo ial ne troviĝas tuj post la priskribata vorto:

- <u>*Tiu bela domo ĉe la maro*</u>*,* ***kiun ni vizitis pasintsomere****, bedaŭrinde estis bruligita. Tiu* helpas montri, ke la *kiu*-frazo priskribas la vorton *domo*, ne *maro*.

Se *tiu* ial ne konvenas, oni povas anstataŭe ripeti post *kiu* O-vorton, kiu montras klare pri kio temas. *Kiu* tiam rolas kiel difinilo de tiu O-vorto:

- <u>*La sola infano*</u> *de mia amiko,* ***kiun infanon vi vidis ĉe mi antaŭ nelonge****, mortis hieraŭ.* Se oni ne aldonus la vorton *infanon* post *kiun*, oni pensus, ke vi vidis la amikon, ĉar la *kiu*-frazo staras tuj post *amiko*. Oni malemas diri *tiu sola infano*, ĉar tiam sonus kvazaŭ ekzistus pli ol unu sola infano. Eble pli bona elturniĝo estas ekz.: *La sola infano de mia amiko,* <u>*tiu infano*</u>*,* ***kiun vi vidis ĉe mi antaŭ nelonge****, mortis hieraŭ.*

Kiam rilata *kiu*-frazo troviĝas frazkomence, oni iafoje metas la priskribatan O-vorton post *kiu* en la subfrazo. En la ĉeffrazo restas nur *tiu*. Tio estas tre speciala frazturno uzata preskaŭ nur en skriba lingvo, kaj eĉ tie nur tre malofte: ***Kiu hundo bojas****,* <u>*tiu*</u> *ne mordas. =* <u>*Tiu hundo*</u>*,* ***kiu bojas****, ne mordas.*

Iafoje frazkomenca *kiu*-frazo povas rilati al *ties* en la ĉeffrazo:

- ***Kiu eĉ nur gratetos al li la haŭton aŭ difektos al li eĉ unu haron****,* <u>*ties*</u> *karnon mi disŝiros je pecoj kaj donos ĝin kiel manĝon al malsataj vulturoj!* [Rt.121]

Sed oni ne uzas *kiu*-frazon post *ties*. Oni ne diras ekz.: ***<u>*Ties*</u> *hejmo,* ***kiu helpis nin****, estis detruita de la soldatoj.** Sed: *La hejmo de* <u>*tiu*</u>*,* ***kiu helpis nin****, estis detruita de la soldatoj.* Oni ankaŭ ne diras: **Ĉi tiu domo estas* <u>*ties*</u>*,* ***kiu helpis nin****.** Sed: *Ĉi tiu domo apartenas al* <u>*tiu*</u>*,* ***kiu helpis nin****.*

### Pli ol unu rilata *kiu*-frazo

Iafoje unu ĉefvorto estas priskribata de pli ol unu rilata *kiu*-frazo. Normale oni por klareco almetas kunligan vorteton (§16), ekz. *kaj* aŭ *sed*:

- *Hieraŭ mi vidis* <u>*viron*</u>*,* ***kiu promenis sur la strato****, kaj* ***kiu portis grandan valizon****.* Ambaŭ *kiu*-frazoj priskribas la vorton *viron*.
- *Dum la trarigardado mi trovis* <u>*diversajn esprimojn*</u>*,* ***kiuj siatempe ŝajnis al mi bonaj****, sed* ***kiuj nun al mi ne plaĉas*** *kaj* ***kiujn mi volonte ŝanĝus****.* [LR.146A] Tri *kiu*-frazoj priskribas la frazparton *diversajn esprimojn*.
- *Glaso de vino estas* <u>*glaso*</u>*,* ***en kiu antaŭe sin trovis vino****, aŭ* ***kiun oni uzas por vino****.* [FE.32]

Se estas pli ol du rilataj *kiu*-frazoj, sufiĉas meti kunligilon antaŭ la lasta *kiu*-frazo:

- *Jen estas afero, **kiu estas tre utila**, **kiu helpos vin en multaj okazoj**, kaj **kiun vi tre zorge gardu**.* Ĉiuj tri *kiu*-frazoj priskribas la vorton *afero*.

### Ne forlasu rilatan *kiu*

Ne forlasu rilatan *kiu* (§33.4.3). En iuj lingvoj tio estas ebla, sed en Esperanto ne.

### Plurakontaj *kiu*-frazoj

Rilata *kiu*-frazo rolas kiel rekta priskribo. Ordinare ĝi iel helpas identigi la priskribatan aferon, aŭ montras ian karakterizon de ĝi. Sed iuj rilataj *kiu*-frazoj estas pli malforte ligitaj al la priskribata vorto. Tia *kiu*-frazo simple daŭrigas la rakontadon. Oni same bone povas uzi apartan ĉeffrazon:

- *Ŝi kun ĝentila rideto transdonis la leteron al la anglino, **kiu leviĝis, faris saluton kaj eliris el la ĉambro**.* [M.22] *= Ŝi kun ĝentila rideto transdonis la leteron al la anglino, kaj tiu (poste) leviĝis ...*
- *La patro ŝovis sin sub la felon, **per kiu li sin kovris**.* [FA4.83] *= La patro ŝovis sin sub la felon, kaj li kovris sin per ĝi.*
- *Venis al ŝi malriĉa virino, **kiu petis ŝin, ke ŝi donu al ŝi trinki**.* [FE.15] *= Venis al ŝi malriĉa virino. Ŝi petis ŝin, ke ...*
- *Kelkaj estimataj scienculoj per sugestio falis en kaptilon, **el kiu ili tamen baldaŭ retiriĝis**.* [L2.218] *= ... falis en kaptilon, sed ili tamen baldaŭ retiriĝis el ĝi.*

En plurakontaj *kiu*-frazoj oni iafoje aldonas O-vorton post *kiu*, por iel klarigi la priskribatan aferon. *Kiu* tiam rolas kiel difinilo de la aldonita O-vorto. Tian aldonan O-vorton oni uzas nur malofte, sed se la priskribata vorto estas propra nomo, tio okazas iom malpli malofte. Alternative oni povas meti la klarigan O-vorton kiel apudmeton (§25.3) post la priskribata vorto:

- *Li ŝuldas al mi mil eŭrojn, **kiun sumon li ne repagis malgraŭ plurfoja rememorigo**. = Li ŝuldas al mi mil eŭrojn. Tiun sumon li ne repagis ...* Sen la klariga vorto *sumon* la frazo fariĝus: *... mil eŭrojn, **kiujn li ne repagis** ...* (kun J-finaĵo). Alia alternativo estas: *... mil eŭrojn, sumon, **kiun li ne** ...* Tiam *sumon* rolas kiel apudmeto de *mil eŭrojn*.
- *Mi iris ankaŭ al Kioto, **kiu urbo tre plaĉis al mi**. = Mi iris ankaŭ al Kioto. Tiu urbo tre plaĉis al mi.* Oni povas ankaŭ diri: *... al Kioto, **kiu tre plaĉis al mi**.* Aŭ: *... al Kioto, urbo, **kiu tre plaĉis al mi**.* La aldono de *urbo* povas esti utila, se la aŭskultanto eble ne scias, kio estas Kioto.
- *Mi tre ŝatas Ĉadon kaj Kenjon, **kiujn landojn mi vizitis plurfoje**.* Aŭ: *Mi tre ŝatas Ĉadon kaj Kenjon, landojn, **kiujn mi vizitis plurfoje**.*

### Emfazaj frazturnoj

Ekzistas speciala emfaza frazturno, en kiu oni uzas prezenton per la verbo *esti* plus rilatan subfrazon kun *kiu*:

- *Li decidas pri ĉi tiaj aferoj. → Estas li, **kiu decidas pri ĉi tiaj aferoj**.* La ĉeffrazo *estas li* prezentas la subjekton emfaze. La *kiu*-frazo rakontas ion pri li.
- *Ne, Pjotr Ivanoviĉ, estis mi, **kiu diris "he!"*** [Rz.14]

Tiajn frazturnojn oni ne trouzu. Ofte oni povas emfazi pli facile per la vortordo: *Pri ĉi tiaj aferoj decidas li.* Legu pli pri vortordo kaj emfazado en §34.1.

Oni simile uzas ankaŭ rilatan *kio* en emfazaj frazturnoj (§33.4.1.2).

### 33.4.1.2. Rilata *kio*

Rilata *kio* povas esti uzata kiel frazenkondukilo simile al rilata *kiu* (§33.4.1.1).

### Rilata *kio* reprezentas alian tabelvorton je O

Oni uzas rilatan *kio* anstataŭ rilata *kiu*, se la subfrazo priskribas tabelvorton je O:

- *Mi volas, ke tio, **kion** mi diris, estu vera.* [FE.24] = *Mi volas, ke tio estu vera. + Mi diris tion.*
- *Mi faros ĉion, **kion** mi povos, por trovi por vi konforman okupon.* [M.36]
- *La juvelista laboro enhavas en si nenion, **kio** superus miajn fortojn.* [M.188]
- *Vi rakontis al mi ion, **kion** mi neniam forgesis.* [FA1.232]
- *El tiuj infanoj* [...] *neniu faris ion eminentan, **kio** meritus mencion.* [FA4.124] Tie ĉi post *ion* sekvas A-vorto, kiu estas rekta priskribo de ĝi. Tiam oni povas uzi rilatan *kiu*: *... neniu faris ion eminentan, **kiu** meritus mencion.* Zamenhof pli ofte uzis *kio* en tiaj frazoj, sed iafoje *kiu*: *Ĝi estas la sonoj de io granda, **kiu** nun naskiĝas.* [OV.361]

Ofte la priskribata tabelvorto estas subkomprenata:

- *Oni ricevas, **kion** oni bezonas.* [FA3.149] = *Oni ricevas tion, **kion** oni bezonas.*
- *Post du aŭ tri tagoj mi jam ne havos per **kio** hejti la ĉambron.* [M.182] = *... ne havos ion, per **kio** mi povus hejti la ĉambron.*
- *Estas makaronioj* [tio]*, **kion** ni manĝas.* Emfaza frazturno (§33.4.1.1) kun subkomprenata *tio*: *Ni manĝas makaroniojn. → Tio, **kion** ni manĝas, estas makaronioj.*

Legu pli pri rilataj subfrazoj kaj forlaso de TI-vortoj: §33.4.3.

## Kvazaŭ subkomprenata *io*

Oni uzas rilatan *kio* anstataŭ *kiu*, se la subfrazo priskribas O-vortecan A-vorton kun tre ĝenerala signifo. Oni povus diri, ke la vorto *io* estas subkomprenata post la A-vorto. Sed efektive oni neniam uzas tian plenan esprimon kun *io*:

- *La sola,* ***kion*** *mi deziras, estas: ke la mondo havu lingvon internacian.* [L1.321] (≈ **La sola io, kion mi deziras ...**)
- *La unua,* ***kion*** *li faris vespere, estis tio, ke li elprenis la nukson.* [FA3.89]
- *La plej bonan,* ***kion*** *vi posedas, mi volas ricevi por mia kara trinkaĵo!* [FA1.96]
- *La juna grafino en la kaleŝo diris, ke la pomarbo estas la plej ĉarma,* ***kion*** *oni povas vidi.* [FA3.18] Ŝi opiniis, ke la pomarbo estas la plej ĉarma vidaĵo entute ebla. Se ŝi nur volus diri, ke ĝi estas la plej ĉarma arbo el ĉiuj arboj, tiam ŝi dirus: *... la plej ĉarma (arbo),* ***kiun*** *oni povas vidi ...*

Se oni ja enmetas O-vorton, ekz. *afero*, oni devas ĉiam uzi rilatan *kiu*: *La sola afero,* ***kiun*** *mi deziras ... La unua afero,* ***kiun*** *li faris vespere ...*

Se la signifo de O-vorteca A-vorto estas malpli abstrakta, kaj oni subkomprenas ian veran O-vorton, tiam oni uzu *kiu*. Vidu ankaŭ la ĉi-antaŭan ekzemplon pri pomarbo:

- *Vi ne estas la unua* [persono], ***kiu*** *parolas al mi en tia maniero.* [M.34]
- *Ĉiu* [el la fratinoj] *estis ravata de la nova kaj bela* [afero], ***kiun*** *ŝi vidis.* [FA1.86]

## Rilata *kio* en plurakontaj subfrazoj

Kiam rilata subfrazo estas plurakonta (§33.4.1.1), oni ofte devas uzi *kio* anstataŭ *kiu* kiel rilatan vorton.

Plurakontaj *kio*-subfrazoj estas ofte laŭ sia senco pli komentaj ol plurakontaj, sed same kiel plurakontaj *kiu*-frazoj, oni povas facile ŝanĝi ilin en memstarajn frazojn. Se en la memstara formo oni povas uzi *tiu* aŭ personan pronomon por la rilataĵo, tiam en la subfraza formo oni uzu *kiu* kiel rilatan vorton. En aliaj okazoj oni uzu *kio* kiel subfrazan enkondukilon. En la memstara formo oni tiam plej ofte devas uzi *tio*.

### *Kio* rilate al tuta frazo aŭ fraza ideo

Plej ofte, kiam oni uzas rilatan *kio* en plurakonta subfrazo, la rilataĵo estas tuta frazo aŭ io frazeca:

- *Ĝi havis verdan koloron.* ***Tio*** *estis agrabla por la okuloj.* → *Ĝi havis verdan koloron,* ***kio*** *estis agrabla por la okuloj.* [FA3.129] = *Estis agrable por la okuloj, ke ĝi havis verdan koloron.* Komparu: *Ĝi havis verdan koloron,* ***kiu*** *estis agrabla por la okuloj.* = *La verda koloro,* ***kiun*** *ĝi havis, estis agrabla por la okuloj.*
- *Ĉiuj floroj kisis sin reciproke.* ***Tio*** *aspektis tre ĉarme.* → *Ĉiuj floroj kisis sin reciproke,* ***kio*** *aspektis tre ĉarme.* [FA1.38] = *Aspektis tre ĉarme, ke ĉiuj floroj kisis sin reciproke.*

- *Ili estis forte lacaj, pri* ***kio*** *certe neniu miros.* FA2.107
- *La ombro moviĝadis,* ***kio*** *cetere povis esti kaŭzata ankaŭ de la neregula moviĝado de la kandela flamo.* FA2.111
- *"Mi cetere ne scias", diris sinjoro Britain, "ĉu oni povus ĝin nomi vera filozofio. Mi iom dubas tion ĉi; sed ĝi bone eltenas kaj ŝparas multe da ĉagreno,* ***kion*** *la ĝusta filozofio ne ĉiam faras."* BV.67

La frazeca rilataĵo povas esti I-verbo:

- *Mi ne volas ĉi tie analizi la kaŭzon de ĉi tiu fakto, ĉar tiu devigus min eniri en regionon politikan,* ***kion*** *mi deziras eviti; mi nur konstatas la fakton.* OV.402 Mi deziras eviti eniri en la regionon politikan.

Iafoje en tia uzo *kio* rilatas sence nur al parto de la priskribata frazo:

- *Antaŭ nelonge ŝi sidis sur la trono,* ***kio*** [...] *tute ne estas interesa.* FA2.62 La rilata vorto *kio* ne reprezentas la tutan antaŭan frazon. Ĝia senco estas la pli ĝenerala ideo *sidi sur (la) trono*. Tio tute ne estas interesa.
- *Li ekvivis tre gaje, iradis tre ofte en la teatron, veturadis en la ĝardenon de la reĝo kaj donadis multe da mono al la malriĉuloj,* ***kio*** *estis tre laŭdinda.* FA1.8 *Kio* reprezentas la ideon: *Li donadis multe da mono al la malriĉuloj.* La ceteraj menciitaj agadoj kredeble ne estis aparte laŭdindaj.
- *La floroj supre sur la tero odoras,* ***kion*** *ne faras la floroj sur la fundo de la maro.* FA1.83

Iafoje rilata *kio* ne reprezentas ĝuste la priskribatan frazon, sed ian alian frazan aŭ frazecan ideon:

- *Oni proponis al li oficon de kuriero,* ***kio*** *promesis esti tre enspeziga afero.* FA3.58 Ĉi tie *kio* ne reprezentas la ideon *oni proponis al li oficon de kuriero*, sed la ideon *ke li eble havos oficon de kuriero*, aŭ *havi oficon de kuriero*.

Iafoje oni povas anstataŭ rilata *kio* uzi *kiu* + ĝeneralsignifan O-vorton (ekz. *afero* aŭ *okazo*) por reprezenti tutan frazon. Tio tamen okazas tre malofte: *Eble ili ne venos, por* ***kiu okazo*** *ni devas esti preparitaj.* = *Eble ili ne venos, por* ***kio*** *ni devas esti preparitaj.*

Iafoje plurakonta *kio*-frazo estas enmetita kiel komentofrazo (§32.2) ene de frazo aŭ antaŭ tiu frazo, kiun ĝi priskribas:

- *La hospitalo estas apartigita de la strato per sufiĉe alta krado, en kiu la dikaj feraj stangoj estas tiel malproksimaj unu de la alia, ke,* ***kio*** *estas publika sekreto, multaj maldikaj loĝantoj de tiu institucio sin trapremas kaj faras ekstere siajn malgrandajn vizitojn.* FA1.128 *Kio* reprezentas la *ke*-frazon *ke multaj maldikaj ...*, sed la *kio*-frazo estas enmetita en la *ke*-frazon tuj post *ke*. Tia ĉi frazkonstruo eble ne estas rekomendinda, ĉar efektive iom malfacile komprenebla.
- *En la brakoj ili tenis partojn de ŝipoj kaj kestojn, ostarojn de bestoj surteraj kaj,* ***kio*** *ŝajnis al la reĝidino la plej terura – virineton de maro, kiun ili estis kaptintaj kaj sufokintaj.* FA1.94 *Kio* reprezentas la frazan ideon: *Ili tenis en la brakoj virineton de maro, kiun ili estis kaptintaj kaj sufokintaj.* Tio ŝajnis al ŝi la plej terura.

### *Kio* rilate al ordinara O-vorto

Iafoje rilata *kio* en plurakonta subfrazo rilatas al ordinara O-vorto. En tiaj okazoj ne temas denove pri la sama aŭ la samaj, sed pri io ajn de tiu speco. Se oni memstarigas la subfrazon, oni uzas *tio* aŭ la saman O-vorton (sen *la* aŭ *tiu*).

- *La dua* [elfa filino] *povosciis iradi flanke de si mem, kvazaŭ ŝi havus ombron,* ***kion*** [...] *la elfoj ne havas.* [FA2.95] = ... *kvazaŭ ŝi havus ombron. Tion la elfoj ne havas. / Ombron la elfoj ne havas.* La elfoj ne havas (ian ajn) ombron.
- *Tie staris ansopoto kun ardantaj karboj,* ***kion*** *ili tie nomas "marito".* [FA1.216] Ĉiun ajn ansopoton kun ardantaj karboj ili tie nomas "marito" (en la itala lingvo). Se oni uzus anstataŭ *kiun*, la senco estus, ke ili nomas "marito" ĝuste tiun ansopoton, kiu staris tie, sed eble ne ĉiujn tiajn ansopotojn. En tiaj ĉi frazoj oni ofte povas anstataŭe uzi *kia* kiel rilatan vorton (§33.4.2), sed tiam ordinare kune kun *tia*: *Tie staris tia ansopoto kun ardantaj karboj,* ***kian*** *ili tie nomas "marito".*
- *Ili alvenis per aŭto,* ***kion*** *mi ankoraŭ ne havas, sed ja planas aĉeti.* Mi ankoraŭ ne havas aŭton, sed mi ja planas aĉeti aŭton. (Se oni tie uzus *kiun*, la senco tute ŝanĝiĝus: Mi ankoraŭ ne havas tiun aŭton per kiu ili alvenis, sed mi ja planas aĉeti ĝin.)
- *Ili devis pagi dek mil dolarojn,* ***kio*** *estas tre granda sumo.* Dek mil dolaroj estas granda sumo. Tio estas granda sumo.

### Aliaj ekzemploj de rilata *kio* en plurakonta subfrazo

Jen pliaj ekzemploj de plurakontaj subfrazoj, en kiuj oni preferas uzi rilatan *kio*, ĉar en memstara frazo oni uzus *tio*:

- *Sur la papero li skribis "918273645",* ***kio*** *poste montriĝis esti lia telefonnumero.* = ... *skribis "918273645". Tio poste montriĝis* ... Se oni aldonas helpan O-vorton antaŭ la telefonnumero, oni ordinare preferas rilatan *kiu*: *Sur la papero li skribis la numeron "918273645",* ***kiu*** *poste montriĝis esti lia telefonnumero.* Tiu numero poste montriĝis esti lia telefonnumero.
- *La limo leviĝas al la valo de la filo de Hinom, ĉe la suda flanko de la Jebusidoj,* ***kio*** *estas Jerusalem.* [Js.15] (La Jebusidoj tie konstruis urbon, kiu poste fariĝis Jerusalem.) La subfrazo estas tia parentezeca aldonaĵo, kian oni kutime enkondukas per *tio estas*: ... *la suda flanko de la Jebusidoj. Tio estas Jerusalem.*

## 33.4.1.3. Rilata *kies*

*Kies* = "de kiu". *De* (§12.3.2) havas tamen multajn diversajn signifojn. *Kies* havas nur tri el tiuj signifoj: **posedo/aparteno, senca objekto** kaj **senca subjekto**. Se temas pri iu alia el la signifoj, kiujn havas *de*, oni devas uzi *de kiu*.

### Poseda *kies*

Rilata *kies* plej ofte montras posedon aŭ apartenon:

- *Jen estas viro, **kies nomo estas Markoto**.* [Zĥ.6] = *Jen estas viro. + Lia nomo estas Markoto.*
- *La ĉambro, **kies pordon la pordisto malfermis**, estis sufiĉe vasta.* [M.7] = *La ĉambro estis sufiĉe vasta. + La pordisto malfermis la pordon de la ĉambro.*

### Objekta *kies*

Rilata *kies* povas montri la sencan objekton de aga O-vorto:

- *Ĝi estas ia ennovaĵo, **pri kies akceptado aŭ neakceptado oni devas konsiliĝi**.* [OV.102] = *Ĝi estas ia ennovaĵo. + Oni devas konsiliĝi pri la akceptado aŭ neakceptado de tiu ennovaĵo.* La priskribo *de tiu ennovaĵo* montras la sencan objekton de *(ne)akceptado*: *Oni devas konsiliĝi, ĉu oni akceptu aŭ ne akceptu tiun ennovaĵon.*

### Subjekta *kies*

Rilata *kies* povas montri la sencan subjekton de aga O-vorto:

- *La serpento, **de kies mordo mortis via patro**, nun portas lian kronon.* [H.33] = *La serpento nun portas lian kronon. + Via patro mortis de la mordo de la serpento. De la serpento* montras la sencan subjekton de *mordo*: *Via patro mortis, ĉar la serpento mordis lin.*

### Eraraj uzoj de *kies*

En iuj lingvoj ekzistas vorto, kiu similas al *kies*, sed kiu havas pli da signifoj. La Esperanta *kies* povas signifi nur *de kiu*, kaj nur kiam temas pri posedo/aparteno, senca objekto aŭ senca subjekto. *Kies* ne povas signifi *el kiu*, *al kiu*, *pri kiu* aŭ simile.

Por kontroli, ĉu rilata *kies* estas ĝusta, oni memstarigu la subfrazon. Se oni tiam uzus *de*, kaj se *de* montras posedon/apartenon, objekton aŭ subjekton, tiam oni povas uzi *kies* en la subfrazo:

- *La asocio, **kies unu el la delegitoj li estas**, nomiĝas UEA.* Se oni memstarigas la subfrazon, ĝi fariĝas: *Li estas unu el la delegitoj **de la asocio**. De* montras apartenon. *Kies* estas do ĝusta. Sed la frazo estas tre malsimpla kaj malfacile komprenebla. Pli facila (sed ne tute samsignifa) estas la jeno: *La asocio, **kies delegito li estas**, nomiĝas UEA.*

### *Kies* ne signifas *el kiu*

*El* (§12.3.5.2) povas interalie montri elekton, apartigon aŭ distingon de unu aŭ pluraj individuo(j) el grupo de individuoj: ***El** ŝiaj multaj infanoj unuj estas bonaj kaj aliaj estas malbonaj.* [FE.12] Tio iom similas al apartena *de*, sed ankaŭ tiam ne estas eble uzi *kies*. Oni devas uzi *el kiuj*:

- *En la ĉambro estis tri personoj, **el kiuj unu leviĝis renkonte al Marta**.* [M.20] Ne estas ĝuste diri: **... tri personoj, kies unu leviĝis ...** Memstarigita frazo estas: *Unu **el** la personoj leviĝis renkonte al Marta.*

Temas pri apartigo de individuo el grupo. Oni devas diri *el la personoj/el ili*, ne *de la personoj/de ili*. Tial *kies* ne estas ebla.

- *La reĝo de Egiptujo parolis al la Hebreaj akuŝistinoj,* ***el kiuj unu estis nomata Ŝifra kaj la dua estis nomata Pua****.* [Er.1] Ne estas eble diri: **... akuŝistinoj,* ***kies*** *unu estis nomata ...**

### *Kies* ne signifas *al kiu*

Rilate al la verbo *aparteni* oni ne povas uzi *kies*, sed devas uzi *al kiu*:

- *Nia asocio,* ***al kiu ne apartenas tiuj personoj****, ne havas ian ajn respondecon pri iliaj agoj.* Ne diru: **Nia asocio, kies ne apartenas ...** La memstara frazo estas: *Tiuj personoj ne apartenas* ***al*** *nia asocio.* Oni neniam diras **aparteni de**.

## 33.4.2. Aliaj rilataj KI-vortoj

### Rilata *kiam*

Rilata *kiam* povas enkonduki tempan subfrazon. Tia subfrazo povas roli kiel priskribo de tempa esprimo en la ĉeffrazo:

- *Antaŭhieraŭ,* ***kiam mi estis en la urbo****, mi aĉetis novan robon. = Antaŭhieraŭ mi aĉetis novan robon. + Tiam mi estis en la urbo.*
- *En tiu tempo,* ***kiam li loĝis en Parizo****, li ofte vizitis min.*
- ***Kiam Nikodemo batas Jozefon****, tiam Nikodemo estas la batanto kaj Jozefo estas la batato.* [FE.22]

Plej ofte tamen mankas tempa esprimo en la ĉeffrazo. Oni povas diri, ke la *kiam*-frazo estas priskribo de subkomprenata *tiam* en la ĉeffrazo:

- *Ili svenas* [tiam]*,* ***kiam ili vidas sangantan anseron****.* [Rt.16]
- ***Kiam mi venis al li****,* [tiam] *li dormis.* [FE.20]
- ***Kiam oni estas riĉa* [...]**, [tiam] *oni havas multajn amikojn.* [FE.16] *= Oni havas multajn amikojn tiam, kiam oni estas riĉa.*
- *Ĝuste* [tiam] ***kiam mi eliris el la preĝejo****, mi renkontis la gantiston Erik.* [FA3.77]

Rilata *kiam*-frazo povas havi tempan rolvorteton antaŭ si. La rolvorteto montras la rolon de la tuta *kiam*-frazo, ne de la vorto *kiam*:

- ***Post*** *kiam ŝi estis mallongan tempon en la arbaro, fariĝis nokto.* [FA1.161] *=* ***Post*** *mallonga estado en la arbaro fariĝis nokto.*
- ***De*** *kiam naskiĝis mia filino, mi estas kiel alia homo. =* ***De*** *la naskiĝo de mia filino mi estas kiel alia homo.*
- *La kverelo komenciĝis,* ***post*** *kiam li foriris. = La kverelo komenciĝis* ***post*** *lia foriro.*
- *Adam vivis,* ***post*** *kiam naskiĝis al li Set, okcent jarojn.* [Gn.5] *= ...* ***post*** *la naskiĝo de Set ...*

Se oni enmetas *tiam* en tiajn frazojn, la rolvorteto staru antaŭ *tiam*: *Adam vivis,* ***post*** *tiam, kiam naskiĝis al li Set, 800 jarojn.*

Ĉe demanda *kiam* estas alie. Rolvorteto antaŭ demanda *kiam* montras la rolon de *kiam*, ne de la tuta demanda frazo: *Ŝi demandis,* ***ĝis*** *kiam mi restos hejme.* = *Ŝi demandis,* ***ĝis*** *kiu tempo mi restos hejme.*

Se oni erare pensus, ke rolvorteto antaŭ rilata *kiam* montras la rolon de *kiam* (anstataŭ de la tuta subfrazo), tiam la signifo draste ŝanĝiĝus, ekz.: *Ŝi edziniĝis, post kiam ŝi naskis infanon.* La ĝusta signifo estas: *Ŝi edziniĝis* ***post*** *la nasko. Ŝi edziniĝis* ***post*** *tiam, kiam ŝi naskis infanon.* Se oni erare rilatigus *post* al *kiam*, la signifo fariĝus: *Ŝi edziniĝis.* ***Post*** *tiam* [= post la edziniĝo] *ŝi naskis infanon.*

Logike oni povus uzi *antaŭ* ĉe subfrazo kun rilata *kiam*: *Li rifuzis foriri,* ***antaŭ*** *kiam mi alvenis.* Sed oni kutime uzas *antaŭ ol* (§33.7) en tiaj okazoj.

Iafoje rilata *kiam*-frazo montras ne tempon, sed okazon aŭ kondiĉon (§14.2.1).

Aliaj enkondukiloj de tempaj subfrazoj estas *dum* (§33.7), *ĝis* (§33.7) kaj *apenaŭ* (§33.7).

### Rilata *kie*

Rilata *kie* povas enkonduki lokan subfrazon. Tia subfrazo povas roli kiel priskribo de loka esprimo en la ĉeffrazo:

- *Mi volis resti tie,* ***kie mi estis****.* [FA3.135] = *Mi volis resti tie. + Mi estis tie.* La esprimo *tie, kie mi estis* estas loka komplemento, kiu montras la lokon de la restado.
- ***Kie fumo leviĝas****, tie fajro troviĝas.* [PE.399]
- *Ĝi troviĝis en granda ĝardeno,* ***kie la pomarboj staris tute kovritaj de floraĵo****.* [FA2.41] = *... en kiu la pomarboj staris ...*
- *La malgranda Niko grimpis sur la stalon,* ***kie li sin kuŝigis****.* [FA1.15] = *Li grimpis sur la stalon. + Li sin kuŝigis sur la stalo.* Ĉi tie la *kie*-subfrazo estas plurakonta (§33.4.1.1). Oni povas same bone uzi du apartajn frazojn: *Li grimpis sur la stalon, kaj tie li sin kuŝigis.*

Iafoje mankas loka esprimo en la ĉeffrazo. Tiam la *kie*-frazo mem rolas kiel loka komplemento en la ĉeffrazo. Oni povus ankaŭ diri, ke *tie* estas subkomprenata en la ĉeffrazo (§33.4.3):

- ***Kie estas sufero****,* [tie] *estas ankaŭ espero.* [PE.542]
- *Elizabeto nun laboras* [tie]*,* ***kie mi antaŭe laboris****.*

Rilata *kie* povas havi direktan rolvorteton aŭ direktan N-finaĵon:

- *Jen la loko,* ***de kie venis la bruo****.* = *Jen (estas) la loko. + De tiu loko venis la bruo.*
- *Finfine ni alvenis,* ***ĝis kie antaŭe neniu homo venis****.*
- *Ĉie,* ***kien mi venas****, troviĝas ia malbonaĵo, kiu premas la koron.* [FA1.144]

Anstataŭ rilata *kie* oni povas ofte uzi *en kiu(j)*, *ĉe kiu(j)*, *sur kio* aŭ simile, precipe se la subfrazo priskribas O-vorton, kiu ne rolas kiel loka komplemento en la ĉeffrazo. Sed *kie* estas ofte pli eleganta:

- *La mallarĝa strato,* ***kie li loĝis****, estis ankoraŭ tiel konstruita, ke* [...] *oni havis tie la tutan varmegon de la suno.* FA2.134 La frazparto *la mallarĝa strato* ne estas loka komplemento, sed subjekto.
- *Marta venis el la hejma bieno,* ***kie floris rozoj kaj kantis najtingaloj****.* M.31 *= ... el la hejma bieno, ĉe kiu floris ...*
- *Ne troviĝas,* ***kie sidi****. = Ne troviĝas io, sur kio oni povus sidi.*

## Rilata *kia*

Rilata *kia* povas enkonduki ecan subfrazon. Rilata *kia*-frazo povas roli kiel priskribo de *tia*, *tiaspeca* aŭ *tiuspeca* en la ĉeffrazo:

- *Ŝi ne estas tia,* ***kia devas esti reĝino****.* FA1.174 *= Ŝi ne estas tia. + Reĝino devas esti tia.*
- *Ĝi* [= la grajno] *ne estas tiaspeca,* ***kia kreskas sur kampo de kampulo****, aŭ* ***per kia oni nutras kokinojn****.* FA1.41 *= Ĝi ne estas tiaspeca. + Tia* [grajno] *kreskas sur kampo de kampulo. + Per tia* [grajno] *oni nutras kokinojn.*
- ***Kia oni vin vidas****, tia oni vin taksas.* PE.340 *= Tia oni vin taksas. + Tia oni vin vidas.*

Rilata *kia*-frazo povas ankaŭ roli kiel priskribo de O-vorto, kiu havas *tia* kiel difinilon:

- *Regis tia frosto,* ***kian ni ĉe ni ne havas eĉ en la plej kruela vintro****.* FA3.83 *Regis tia frosto. + Tian froston ni ĉe ni ne havas eĉ en la plej kruela vintro.*
- *Se vi tamen volas havi oron, vi povas ĝin ankaŭ ricevi en tia granda kvanto,* ***kian vi povos porti****.* FA1.6

En ĉi tiaj frazoj *tia* ofte staras post la O-vorto, kvankam ĝi estas difinilo: *La arbo de la suno estis belega arbo tia,* ***kian ni neniam vidis****.* FA3.114

Se rilata KI-frazo priskribas O-vorton kun *tia*, oni povas ankaŭ uzi rilatan *kiu*: *Vi havas plenan rajton uzi la monon en tia maniero,* ***kiu ŝajnas al Vi la plej bona****.* L2.126

Rilata *kiu* montras certan individuon, dum rilata *kia* montras specon:

- *Mi uzis tiun aŭton,* ***kiu povas veturi tre rapide****.* Oni parolas pri certa individua aŭto. Ĝi povas veturi tre rapide.
- *Mi uzis tian aŭton,* ***kia povas veturi tre rapide****.* Oni parolas pri speco de aŭto. Ĉiuj aŭtoj de tiu speco povas veturi tre rapide.

Sed en tiuj ĉi ekzemploj jam *tiun* kaj *tian* sufiĉe klare montras la distingon inter individuo kaj speco. Oni povas do uzi *kiu* en ambaŭ subfrazoj. Pli ofte oni preferas *kiu*, sed *kia* pli akcentas, ke temas pri speco.

Uzu rilatan *kia* nur antaŭ frazo kun verbo. Antaŭ sola frazparto, aŭ grupo de frazpartoj sen verbo, oni uzu komparan *kiel* (§20.1): *Li vizitis (tiajn) urbojn **kiel Parizo***. Ne diru: **... urbojn kia Parizo.**

### Rilata *kiel*

Rilata *kiel* povas enkonduki manieran aŭ gradan subfrazon. Rilata *kiel*-frazo priskribas *tiel* aŭ frazparton kun *tiel* en la ĉeffrazo, sed ofte *tiel* estas forlasita (§33.4.3). Tiam la *kiel*-frazo mem rolas kiel maniera aŭ grada komplemento en la ĉeffrazo:

- *Oni ludas sur fortepiano, tamen tre mallaŭte kaj tiel bele, **kiel ŝi neniam antaŭe aŭdis**.* [FA1.34]
- *Li komprenas predikon* [tiel], ***kiel bovo*** [komprenas] ***muzikon**.* [PE.8]
- *Ĉiu penis sin savi* [tiel], ***kiel li povis**.* [FA1.89]

Rilata *kiel*-frazo iafoje priskribas tutan frazon. Tiam *kiel* reprezentas la ideon de la tuta frazo, simile al rilata *kio* (§33.4.1.2):

- *Ŝia beleco, **kiel oni diris**, estas la deloga beleco de la malbono.* [FA3.142] = *Ŝia beleco estas la deloga beleco de la malbono. + Tiel oni diris.* = *Oni diris, ke ŝia beleco estas ...*

*Kiel* estas ankaŭ ĝenerala kompara vorto (§20.1). Tiam *kiel* normale enkondukas ne frazon, sed solan frazparton aŭ grupon de frazpartoj sen verbo.

### Rilata *kiom*

Rilata *kiom* povas enkonduki kvantan aŭ mezuran subfrazon. Rilata *kiom*-frazo rolas kiel priskribo de *tiom* aŭ frazparto kun *tiom* en la ĉeffrazo, sed ofte *tiom* estas forlasita (§33.4.3):

- *Ŝi elpaŝis antaŭen tiom multe, **kiom ŝi povis**.* [FA3.65] = *Ŝi elpaŝis antaŭen tiom multe. + Tiom ŝi povis.*
- *Nun vi ricevos tiom multe da mono, **kiom vi volas havi**.* [FA1.5]
- *Ĉiuj donas al mi prunte* [tiom], ***kiom mi volas**.* [Rz.93]
- *Al mia festo povas veni tiom el viaj amikoj, **kiom volas**.*

Subfrazo kun rilata *kiom* ofte montras ian limigon:

- *La kompatinda stana soldato tenis sin, **kiom li povis**, tute rekte.* [FA1.156] Liaj fortoj estis limigitaj.
- *Unu el la plej kuraĝaj knaboj kaj iom post iom ankaŭ ĉiuj aliaj ekkantis strofon el malnova kanto pri cikonioj, **kiom ili tion memoris**.* [FA1.205] Estis limoj de ilia memoro. Ili ne povis kanti pli ol la memoro permesis.
- ***Kiom mi vidas**, vi havas nur unu filon.* [Rt.51] Mi ne povas vidi pli.

### Rilata *kial*

Ankaŭ *kial* estas uzata kiel rilata vorto, sed nur por rekte priskribi O-vorton kiel *kaŭzo* aŭ *motivo*, kaj eĉ tiam nur tre malofte:

- *La efektiva kaŭzo, **kial ili ne aliĝas al ni**, estas tio, ke ili timas.* [OV.123] = *La efektiva kaŭzo estas tio, ke ili timas. + Tial ili ne aliĝas al ni.* Oni povas

ankaŭ diri ... *la kaŭzo, pro kiu ili ne aliĝas al ni* ... Pli ofte oni tamen uzas *ke*-frazon: ... *la kaŭzo, ke ili ne aliĝas al ni* ...

Oni do ne uzas frazojn kiel: **Ili foriris tial, **kial mi foriris**.** Sed oni diras: *Ili foriris pro la sama kaŭzo, **kial mi foriris**.* Aŭ pli ofte: ... *pro la sama kaŭzo, pro kiu mi foriris.*

Por reprezenti tutan frazon, kiu montras kialon, oni povas uzi *pro kio*: *Mi ne ricevis vian leteron, **pro kio** mi ne respondis.* Oni ankaŭ povas renversi la frazokonstruon, uzante *ĉar* (§33.6): ***Ĉar** mi ne ricevis vian leteron, mi ne respondis.*

Rilata *kial*-frazo ne montras mem kaŭzon aŭ motivon. La kaŭzon montras la vorto, kiun la *kial*-frazo priskribas. *Kial* reprezentas tiun kaŭzon en la subfrazo. Por enkonduki subfrazon, kiu mem montras kaŭzon aŭ motivon, oni uzas *ĉar* (§33.6): *Ili foriris, **ĉar** mi foriris.* (Mia foriro estis la kaŭzo de ilia foriro.)

### 33.4.3. Rilataj subfrazoj — forlaso de TI-vorto

Rilata KI-vorto ofte kunlaboras kun samspeca TI-vorto en la ĉeffrazo: *Tie staras tiu, **kiu demandis pri vi hieraŭ**.* Iafoje oni povas forlasi la TI-vorton: ***Kiu dormas longe**, vivas mallonge.* [PE.729] = *Tiu, **kiu dormas longe, vivas mallonge**. Li tuj faris, **kion mi volis**.* [FE.31] = *Li tuj faris tion, **kion mi volis**.*

Sed ofte tia forlaso tute ne estas ebla. La baza regulo estas, ke la rilata KI-vorto kaj la responda TI-vorto devas havi la saman formon: Ili estu de la sama tabelvorta grupo (*tiu – kiu*, *tio – kio*, *tiel – kiel* k.t.p.), kaj ili havu la saman rolmontrilon, aŭ ili estu ambaŭ sen rolmontrilo. Krome oni ne povas ellasi TI-vorton, kiu havas antaŭ si rolvorteton, lasante la rolvorteton sola, ĉar rolvorteto ĉiam bezonas ion, kies frazrolon ĝi montras. Entute estas preferinde neniam forlasi TI-vorton, kiu havas rolvorteton antaŭ si: *Marta renkontiĝis* [...] *kun tio, **kun kio renkontiĝas milionoj da homoj**.* [M.16] Prefere ne: **Marta renkontiĝis, kun kio renkontiĝas ...**

Por eviti miskomprenojn oni ellasu TI-vorton nur malofte, kaj nur en tiaj okazoj, en kiuj tia forlaso estas kutima. Alie la rezulta frazo povas fariĝi malfacile komprenebla.

#### *Tiu kiu*

- *Tiu, **kiu havas forton**, havas rajton.* → ***Kiu havas forton**, havas rajton.* [PE.517]
- *Plej bone ridas tiu, **kiu laste ridas**.* → *Plej bone ridas, **kiu laste ridas**.* [PE.242]
- ***Kiu okupas sin je meĥaniko**, estas meĥanikisto, kaj **kiu okupas sin je ĥemio**, estas ĥemiisto.* [FE.32] = *Tiu, **kiu okupas sin** ...*
- *Mi pagis al tiu, **al kiu oni devis** **[pagi]**.* → *Mi pagis, **al kiu oni devis**.* [M.6] Ĉi tie Zamenhof ellasis TI-vorton, kiu havas rolvorteton. Tio estas nekutima kaj neimitinda.

Oni normale ne ellasas solan *tiun* aŭ *tiujn*:

- *Mi finfine provis tiujn,* ***kiujn vi tiom laŭdis***. Ne diru: **Mi finfine provis, kiujn vi tiom laŭdis.**

Se *tiu* staras antaŭ O-vorto kiel difinilo de ĝi, oni ne povas forlasi *tiu* sen ŝanĝi la signifon. Sed oni ofte povas ŝanĝi *tiu* al *la* sen grava signifoŝanĝo:

- *Li ankoraŭ ne redonis tiun libron,* ***kiun li pruntis de mi***. → *Li ankoraŭ ne redonis la libron,* ***kiun li pruntis de mi***. Se oni dirus: *Li ankoraŭ ne redonis libron,* ***kiun*** ..., temus pri unu el tiuj libroj, kiujn li pruntis de mi. La signifo ŝanĝiĝus.

### *Tio kio*

- *Tio,* ***kio pasis****, ne revenos.* → ***Kio pasis****, ne revenos.* PE.73
- *Sorto ofte alsendas tion,* ***kion*** *oni ne atendas.* → *Sorto ofte alsendas,* ***kion oni ne atendas***. PE.554
- *Mi neniel povas kompreni tion,* ***kion vi parolas***. → *Mi neniel povas kompreni,* ***kion vi parolas***. FE.28

### *Tiam kiam*

Se rilata *kiam*-frazo rilatas al *tiam*, oni plej ofte forlasas *tiam*. Oni retenas *tiam* nur se oni volas emfazi:

- ***Kiam oni estas riĉa* [...]**, [tiam] *oni havas multajn amikojn.* FE.16
- ***Kiam via domo estis konstruata****,* [tiam] *mia domo estis jam longe konstruita.* FE.25
- ***Kiam li estis ĉe mi****,* [tiam] *li staris tutan horon apud la fenestro.* FE.26

Anstataŭ *post tiam kiam*, *de tiam kiam* k.t.p., oni normale uzas nur *post kiam*, *de kiam* k.t.p. Oni do forlasas *tiam*, sed konservas la rolvorteton. En tiaj okazoj la rolvorteto rilatas ne al la vorto *kiam*, sed al la tuta *kiam*-frazo:

- *Post tiam,* ***kiam alvenis Karlo****, la festo fariĝis vere amuza.* → *Post* ***kiam alvenis Karlo****, la festo fariĝis vere amuza.*
- *De tiam,* ***kiam mortis lia edzino****, li vivas tute sola.* → *De* ***kiam mortis lia edzino****, li vivas tute sola.*

Anstataŭ *ĝis (tiam) kiam* oni diru simple *ĝis*. Oni ankaŭ ne uzu *dum (tiam) kiam*, sed simple *dum*. *Ĝis* (§33.7) kaj *dum* (§33.7) estas mem frazenkondukiloj, kaj tute ne bezonas helpon de *kiam*. Anstataŭ *antaŭ tiam kiam* oni normale uzas *antaŭ ol* (§33.7).

### *Tie kie*

Se rilata *kie*-frazo rilatas al sola *tie*, oni ofte forlasas *tie*, sed oni povas konservi *tie* por emfazo:

- ***Kie estas pano****,* [tie] *ne mankas panpecetoj.* PE.273
- ***Kie lumo ekzistas****,* [tie] *ankaŭ ombro troviĝas.* PE.410
- *Ŝi povis iri* [tien]*,* ***kien ŝi volis***. FA1.44

### *Tia kia*

Rilata *kia*-frazo ĉiam rilatas al *tia* en la ĉeffrazo. Plej ofte oni konservas *tia*, sed se la frazo restas klara, oni povas ĝin ellasi:

- *Li havas* [tian] *kapon, **kian vi ne trovos en la tuta mondo**.* Gm.53
- *Li ĵuris ekbruligi por li funebran torĉon* [tian], ***kian** ankoraŭ neniu reĝo iam havis.* Rt.60

### *Tiel kiel*

Rilata *kiel*-frazo ĉiam rilatas al *tiel* en la ĉeffrazo, sed ofte oni povas subkompreni *tiel*:

- *Ne vivu* [tiel] ***kiel vi volas**, vivu* [tiel] ***kiel vi povas**.* PE.51
- *Bojas hundido* [tiel], ***kiel ĝi aŭdas de hundoj**.* PE.691
- *Ĉiu iras* [tiel], ***kiel saĝ' al li diras**.* PE.355

### *Tiom kiom*

Rilata *kiom*-frazo ĉiam rilatas al *tiom* en la ĉeffrazo, sed ofte oni povas subkompreni *tiom*:

- *Da pulvo ni havas* [tiom] ***kiom vi volas**.* Rt.66
- *Mi penos* [tiom], ***kiom mi povos**, plenumi la deziron de la komitato.* L1.168

Se antaŭ *tiom* staras *ol*, oni plej ofte ellasas *tiom*, kaj metas *ol* rekte antaŭ la *kiom*-frazo:

- *Pli granda estas mia puno, ol tiom, **kiom mi povos elporti**. → Pli granda estas mia puno, ol **kiom mi povos elporti**.* Gn.4
- *Se vi scias pentri, tio povas iom utili al vi, tamen multe malpli, ol tiom **kiom utilus lerteco en muziko**. → Se vi scias pentri, tio povas iom utili al vi, tamen multe malpli, ol **kiom utilus lerteco en muziko**.* M.33

En tiaj frazoj oni povas eĉ ellasi *kiom*, ĉar *ol* (§33.7) sufiĉas kiel frazenkondukilo: *Pli granda estas mia puno, **ol mi povos elporti**. ... multe malpli, **ol utilus lerteco en muziko**.*

### *Ties kies*

Rilata *kies*-frazo treege malofte rilatas al *ties* en la ĉeffrazo. Kiam tiel tamen iafoje estas, oni apenaŭ povas forlasi *ties*:

- ***Kies ĝi estas**, ties ĝi restu.*

### *Tial kial*

Rilata *kial*-frazo neniam rilatas al *tial* en la ĉeffrazo (§33.4.2).

### Malsamaj rolmontriloj

Ellaso de la TI-vorto ĉe tiaj ĉi rilataj subfrazoj normale ne estas ebla, se la TI-vorto kaj la rilata KI-vorto havas malsamajn rolmontrilojn, aŭ se unu el ili havas kaj la alia ne havas rolmontrilon.

Tial ne diru: **Mi konas, **kiu venis**.** Diru: *Mi konas tiun, **kiu venis**.* Ne diru: **Ĝi estas besto, **kian vi timas**.** Sed: *Ĝi estas tia besto, **kian vi timas**.*

Ne diru: **Ili loĝas, **de kie mi venas**.** Oni devas diri: *Ili loĝas tie, **de kie mi venas***. Ankaŭ ne uzu: **Li devenas, **kien mi iros**.** Diru: *Li devenas de tie, **kien mi iros***. Oni ankaŭ ne povas forlasi *tie*, sed konservi rolvorteton, kiu starus antaŭ *tie*. Ne diru: **Li venas de **kie mi loĝas**.** Diru: *Li venas de tie, **kie mi loĝas***.

Sed en prezentaj esprimoj kiel *jen tio, kion ...*, *jen estas tio, kion ...* kaj *tio estas tio, kion ...* oni iafoje forlasas *tio* kontraŭe al la ĉi-antaŭa regulo:

- *Jen* [tio] ***kion diris Aĥitofel***. [Sm2.17]
- *Kaj jen estas* [tio], ***kion la Izraelidoj ekposedis en la lando Kanaana***. [Js.14]
- *Tio estas* [tio], ***kion diris al ili ilia patro***. [Gn.49]

### Ne forlasu rilatan KI-vorton

En kelkaj lingvoj oni povas iafoje forlasi rilatan KI-vorton. Tio ne estas ebla en Esperanto. Ne diru: **La viro, **mi vidis**, portis valizon.** Diru: *La viro, **kiun mi vidis**, portis valizon.* Ne diru: **Nun estas la horo, **ŝi normale alvenas**.** Diru: *Nun estas la horo, **kiam ŝi normale alvenas***.

En iuj lingvoj oni povas iafoje forlasi la rilatan KI-vorton, sed konservi eventualan rolvorteton, kiu tiam staras sola ie en la subfrazo (eĉ en la fino). Tio estas absolute neebla en Esperanto. Rolvorteto devas stari antaŭ tiu frazparto, kies rolon ĝi montras. Ne diru: **Mi vidis tiun knabinon, **vi parolis pri**.** Nepre diru: *Mi vidis tiun knabinon, **pri kiu vi parolis***.

## 33.5. *Se*-frazoj

*Se* = “sub la kondiĉo ke, kun la supozo ke, en la okazo ke”. *Se* enkondukas subfrazon, kiu montras kondiĉon, supozon aŭ okazon:

- ***Se li scius, ke mi estas tie ĉi**, li tuj venus al mi.* [FE.20] = *En la okazo, ke li scius ...* Oni uzas US-verbojn, ĉar temas pri nura fantazio.
- ***Se mi estus sana**, mi estus feliĉa.* [FE.19] = *Sub la kondiĉo, ke mi estus sana ...*
- ***Se mi havus multe da mono**, mi aĉetus aŭton.* La US-formoj montras, ke temas pri fantazio. La parolanto scias, ke li ne havas multe da mono.
- ***Se li havas multe da mono**, li verŝajne aĉetos aŭton.* La AS-formo kaj OS-formo (reala modo) montras, ke povas esti realeco. Povas esti, ke li vere havas multe da mono, sed oni ne scias certe.
- ***Se iu havas multe da mono**, tiu havas ankaŭ multe da problemoj.* La AS-formoj montras, ke temas pri ĉiam valida principo.
- ***Se li jam venis**, petu lin al mi.* [FE.26] Povas esti, ke li jam venis. Tial reala modo, IS-formo.
- *Mia opinio estas: prenu mem akvon, **se vi volas trinki**.* [FE.19]
- *Mi ne farus la eraron, **se li antaŭe dirus al mi la veron** (aŭ **se li estus dirinta al mi la veron**).* [FE.24] Oni povas uzi simplan US-formon, eĉ kiam temas pri fantazio pri pasinta tempo. US-verboj estas tempe neŭtralaj.

- *Mia ora ringo ne estus nun tiel longe serĉata,* ***se ĝi ne estus tiel lerte kaŝita de vi***. [FE.25]
- *Tiu ĉi libro havas sesdek paĝojn; tial,* ***se mi legos en ĉiu tago po dek kvin paĝoj****, mi finos la tutan libron en kvar tagoj.* [FE.14] Oni ankaŭ povas uzi US-formojn en ĉi tiaj frazoj. Ĉe estonta tempo ne estas ĉiam eble fari klaran distingon inter fantazio kaj fakto, ĉar la estonteco ĉiam estas necerta.

## Helpa *tiam*

Kiam *se*-frazo troviĝas frazkomence, oni ofte uzas *tiam* en la ĉeffrazo por helpi al klareco. *Tiam* reprezentas la ideon de la *se*-frazo. Oni povas ankaŭ uzi *tiuokaze*, *tiaokaze* aŭ simile:

- ***Se ĉiu balaos antaŭ sia pordo****, tiam en la tuta urbo estos ordo.* [PE.353]
- ***Se ni konscios bone la esencon kaj celon de niaj kongresoj****, tiam ni venados al ili kun ĉiam freŝa kaj neniam malfortiĝanta entuziasmo.* [OV.377]

## *Se*-frazo + *tio*

Iafoje *tio* en la ĉeffrazo reprezentas la ideon de antaŭa *se*-frazo:

- ***Se ŝi havas multe da mono****, tio ne nepre signifas, ke ŝi estas feliĉa. = Se ŝi havas multe da mono, la fakto, ke ŝi havas multe da mono, ne nepre signifas ...*
- ***Se malgraŭ ĉiuj ventoj kaj puŝoj ĝi*** [= Esperanto] ***dum dudek kvin jaroj vivis kaj kreskis regule kaj rekte****,* [...] *ni povas pri tio sincere nin gratuli.* [OV.407] *= ... ni povas pri la vivo kaj kreskado sincere nin gratuli.*

## Deziraj *se*-frazoj

*Se* estas uzata ankaŭ en ĉeffrazo por esprimi fortan deziron. Ofte oni tiam aldonas *nur* (§14.3.14) por akcenti la deziran sencon. Se la deziro estas nerealigebla, oni uzas US-modon (§26.4). Alie oni uzas OS-formon (§26.2.3) (normale ĉiam kun *nur*):

- *Ho,* ***se*** *mi estus sola!... – ŝi pensis. –* ***Se*** *mi ne havus infanon!* [M.61] *= Mi deziregas, ke mi estu sola, ke mi ne havu infanon (sed tio ne estas ebla).*
- *Ha, kia agrablaĵo estus nun unu alumeto!* ***Se*** *ŝi nur povus kuraĝi elpreni unu el la skatoleto, ekfroti ĝin je la muro kaj varmigi al si sur ĝi la fingrojn!* [FA2.113]
- ***Se*** *oni nur ne refandos min!* [FA2.119]

Oni povas diri, ke vera ĉeffrazo estas subkomprenata: *Ho,* ***se mi estus sola****, tiam mi estus feliĉa!*

## *Se* antaŭ I-verbo

Iafoje oni mallongigas *se*-frazon, en kiu la ĉefverbo havas U-finaĵon, anstataŭigante la ĉefverbon per I-verbo kaj forlasante la subjekton. Vidu ekzemplojn en la klarigoj pri I-verboj uzataj kvazaŭ ĉefverboj (§27.6).

## 33.6. *Ĉar*-frazoj

*Ĉar* = "pro tio ke". *Ĉar* enkondukas subfrazon, kiu montras kaŭzon aŭ motivon:

- *La tranĉilo tranĉas bone,* ***ĉar ĝi estas akra****.* FE.16 *= La fakto, ke la tranĉilo estas akra, estas la kaŭzo, ke ĝi tranĉas bone.*
- *La infano ploras,* ***ĉar ĝi volas manĝi****.* FE.16 *= La fakto, ke la infano volas manĝi, estas la kaŭzo, ke ĝi ploras.*
- ***Ĉar vi estas tiel servema****, mi faras al vi donacon.* FE.19
- *Venigu la kuraciston,* ***ĉar mi estas malsana****.* FE.39
- *La hirundo flugis trans la riveron,* ***ĉar trans la rivero sin trovis aliaj hirundoj****.* FE.26
- *Donu al la birdoj akvon,* ***ĉar ili volas trinki****.* FE.9
- *Li estas mia onklo,* ***ĉar mia patro estas lia frato****.* FE.18 La fakto, ke mia patro estas lia frato, estas la motivo por nomi lin mia onklo.

### Helpa *tial*

Se *ĉar*-frazo troviĝas frazkomence, oni ofte uzas *tial* (§14.3.1) en la ĉef-frazo. *Tial* reprezentas la ideon de la *ĉar*-frazo:

- ***Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon****, <u>tial</u> Esperanto estas "nenies propraĵo".* OV.238 En la fino de la longa *ĉar*-frazo oni eble forgesis, ke ĝi komenciĝis per *ĉar*. *Tial* enkondukas la sekvon de la kaŭzo, kaj memorigas, ke temas pri kaŭzo.
- ***Ĉar ĉiu amas ordinare personon, kiu estas simila al li****, <u>tial</u> tiu ĉi patrino varmege amis sian pli maljunan filinon.* FE.13

Kelkfoje oni uzas *tial* rekte antaŭ *ĉar* por emfazi:

- *Mi petas tion ĉi <u>tial</u>,* ***ĉar mi scias la inklinon de la plimulto da homoj****.* FK.232 Oni povas forlasi *tial*.

Post *tial* oni uzas tamen normale *ke*-frazon. *Tial ke* = *pro tio ke* = *ĉar*: *Tio ĉi estas nur <u>tial</u>,* ***ke la ideo mem de lingvo "tutmonda" estas tiel alta kaj alloga****.* FK.230 La varianton **pro tio ĉar** oni tamen ne uzu.

### *Ĉar* en ĉeffrazo

*Ĉar*-frazo estas iafoje ne subfrazo, sed memstara ĉeffrazo, kiu klarigas antaŭan frazon:

- *"Vi estas tiel bela, tiel bona kaj tiel honesta, ke mi devas fari al vi donacon" (****ĉar tio ĉi estis feino, kiu prenis sur sin la formon de malriĉa vilaĝa virino, por vidi, kiel granda estos la ĝentileco de tiu ĉi juna knabino****).* FE.15 *= Tion ŝi diris, ĉar tio ĉi estis feino ...*
- *Ruben diris al ili: Ne verŝu sangon;* [...] *manon ne metu sur lin.* ***Ĉar li intencis savi lin el iliaj manoj****.* Gn.37 *= Tion li diris, ĉar li intencis ...*

## 33.7. Aliaj subfrazoj — *apenaŭ, dum, ĝis, kvankam, kvazaŭ, ol*

### *Apenaŭ*

*Apenaŭ* (§14.3.7) plej ofte estas E-vorteca vorteto, sed ĝi ankaŭ povas esti enkondukilo de tempa subfrazo. Tiam *apenaŭ* signifas "tuj post kiam" aŭ "preskaŭ samtempe kiam". Tiaj *apenaŭ*-frazoj staras ĉiam antaŭ la ĉeffrazo:

- ***Apenaŭ ŝia patrino ŝin rimarkis**, ŝi kriis al ŝi: "Nu, mia filino?"* [FE.21] *= Tuj post kiam ŝia patrino ŝin rimarkis (preskaŭ samtempe), ŝi kriis ...*
- ***Apenaŭ ŝi venis al la fonto**, ŝi vidis unu sinjorinon, tre riĉe vestitan, kiu eliris el la arbaro kaj petis de ŝi trinki.* [FE.19]
- ***Apenaŭ ŝi ektuŝis ŝian brakon**, el la buŝo de Janjo elsaltis krieto de doloro.* [M.128]

Alternative oni povas uzi *apenaŭ* kiel E-vortecan vorteton en ĉeffrazo: ***Apenaŭ** ŝi ektuŝis ŝian brakon, **kiam** el la buŝo ...* La frazo *kiam el la buŝo ...* estas nun tempa subfrazo.

### *Dum*

*Dum* enkondukas tempan subfrazon. *Dum*-frazo montras ion, kio daŭras samtempe kun la ĉeffrazo. Oni uzas *dum*, se kaj la subfrazo kaj la ĉeffrazo estas pli-malpli daŭraj, kaj daŭras dum pli-malpli la sama tempo:

- *Unu el la vojaĝantoj gardodeĵoris, **dum la aliaj dormis**.* [FA1.143] La gardodeĵorado daŭris samtempe kiel la dormado.
- ***Dum ŝi parolis**, elfalis el ŝia buŝo multego da diamantoj.* [FE.17]
- *Restu apud mi, **dum mi kun li ekstere parolos**.* [BV.68]

Ofte *dum*-frazo montras ion, kio kontrastas al la ĉeffrazo. Tiam la tempodaŭra signifo povas malfortiĝi kaj iafoje preskaŭ malaperi:

- ***Dum interne ĉio kantadis kaj ĝojadis**, ŝi sidis malgaja en sia ĝardeneto.* [FA1.93] La du agoj, kiuj ja estis samtempaj kaj daŭraj, estis forte kontrastaj unu al la alia.
- *Li estas nur unufoja mensoginto **dum vi estas ankoraŭ nun ĉiam mensoganto**.* [FE.22] La du statoj estas ja samtempaj (kvankam la ago de la unufoja mensoginto okazis antaŭe), sed grava estas la kontrasto inter la unufoja mensogo kaj la ĉiama mensogado.
- ***Dum la vizaĝo estis juna, freŝa, bela**, la frunto sola estis velkinta kaj duone maljuniĝinta.* [M.150] Gravas nur la kontrasto.

*Dum* estis komence nur frazenkondukilo. En la *Fundamento* ĝi estas uzata nur tiel. Poste *dum* fariĝis ankaŭ rolvorteto (§12.3.6.2): ***Dum la manĝado** venas apetito.* [PE.612] Iuj volas uzi *dum* nur kiel rolvorteton, kaj ekuzas **dum (tio) ke** antaŭ subfrazo. Tiamaniere ili forprenas de *dum* ĝian originan rolon, kio ne estas bona ideo.

Se ne estas tiel, ke ambaŭ agoj estas daŭraj, aŭ se oni ne volas aparte montri daŭrecon, oni uzas rilatan *kiam* (§33.4.2). Tiam la du agoj eble estas samtempaj nur momente: ***Kiam mi venis al li**, li dormis.* [FE.20] ***Kiam oni estas riĉa***

**[...]**, *oni havas multajn amikojn.* [FE.16] *Dum* kaj *kiam* montras malsamajn nuancojn. Oni do ne uzu ambaŭ samtempe. Ne diru: **Tio okazis,* ***dum kiam mi loĝis en Romo****.** Diru ... *dum mi loĝis en Romo* aŭ ... *kiam mi loĝis en Romo*, depende de la celita senco.

### *Ĝis*

*Ĝis* enkondukas subfrazon, kiu montras la tempan finpunkton de la ĉeffrazo. Kiam la ago de la *ĝis*-frazo komenciĝas, la ago de la ĉeffrazo finiĝas:

- *Ili persekutos vin,* ***ĝis vi pereos****.* [Re.28] Kiam vi pereos, finiĝos la persekutado.
- *Malĝoje ŝi eliris el la palaco kaj iris dum la tuta tago tra kampoj kaj marĉoj,* ***ĝis ŝi venis al la granda arbaro****.* [FA1.161] Kiam ŝi venis al la granda arbaro, ĉesis la irado.
- *Mi ne donos al vi manĝi,* ***ĝis vi pagos por la antaŭa****.* [Rz.22] = *Mi donos manĝi nur post kiam vi pagos por la antaŭa.* La ne-donado de manĝo ĉesos, kiam okazos la pago.
- *Ĝi simile al birdo flugis alte en la aeron,* ***ĝis ĝi fine tute malaperis for de la okuloj****.* [FA2.33] La flugado ne vere ĉesis, sed nur ŝajnis ĉesi.

*Ĝis*-frazo estas iafoje helpata de *tiel longe* en la ĉeffrazo:

- *Ili jam obstine celados al ĝi ĉiam pli kaj pli kaj ne ĉesos en sia celado tiel longe,* ***ĝis ili la aferon atingos****.* [FK.265]

*Ĝis*-frazo ĉiam montru ion pli-malpli momentan. Ne diru: **Mi restis, ĝis li dormis.** Diru: *Mi restis, ĝis li ekdormis.* Aŭ: *Mi restis, ĝis mi vidis, ke li dormas.* Aŭ simile.

En tempa subfrazo estas superflue, eĉ evitinde, aldoni *kiam* post *ĝis*. Ne diru: **Mi daŭrigos demandadi,* ***ĝis kiam vi respondos****.** Diru simple: *Mi daŭrigos demandadi,* ***ĝis vi respondos****.* *Ĝis* estas mem frazenkondukilo, kaj ne bezonas helpon de *kiam*. Sed se temas pri demanda subfrazo, *ĝis kiam* estas tute normala: *Mi demandis,* ***ĝis kiam ili restos tie****.*

Povas ŝajni strange, ke oni uzu *ĝis kiam* nur ĉe demandoj. La klarigo estas, ke nedemanda *ĝis kiam* estas tute alia frazkonstruo ol demanda *ĝis kiam*. La simileco estas nur ŝajna. Antaŭ nedemanda subfrazo *ĝis* rilatas al la tuta subfrazo: *Mi daŭrigos demandadi,* ***ĝis*** *vi respondos.* = *Mi daŭrigos demandadi* ***ĝis*** *la tempo de via respondo.* En demanda subfrazo tamen *ĝis* rilatas nur al *kiam*: *Mi demandis,* ***ĝis*** *kiam ili restos tie.* = *Mi demandis: "****Ĝis*** *kiu tempo ili restos tie?"* Ĉe ĉi tia demanda subfrazo, kaj *ĝis* kaj *kiam* estas nepre bezonataj por la signifo. Ĉe tempa *ĝis*-frazo *kiam* estas tamen tute superflua. Aldono de tia superflua *kiam* povus iafoje eĉ kredigi, ke temas pri demando, kvankam tiel tute ne estas.

Iuj erare aldonas *ne* en *ĝis*-frazo (pro nacilingva influo), kio donas tute malĝustan sencon. Oni erare diras ekz.: **Mi rifuzos kredi al viaj vortoj,* ***ĝis*** *vi* ***ne*** *donos pruvojn.** La intencita senco estas, ke la ago "rifuzi kredi al viaj vortoj" ĉesos en la momento, kiam pruvoj ja estos donitaj. Oni do devas diri: *Mi rifuzos kredi al viaj vortoj,* ***ĝis*** *vi donos pruvojn.* Se oni uzas *dum* anstataŭ *ĝis*, oni tamen uzu *ne*: *Mi rifuzos kredi al viaj vortoj,* ***dum*** *vi* ***ne***

*donos pruvojn.* La ago “rifuzi kredi al viaj vortoj” daŭros dum tiu tempo, kiam vi ne donos pruvojn (ĝis la momento, kiam vi ja donos pruvojn).

*Ĝis* estas dekomence ne nur frazenkondukilo, sed ankaŭ rolvorteto (§12.3.5.3): *Post la vespermanĝo niaj fratoj eliris kun la gastoj el sia domo kaj akompanis ilin* ***ĝis ilia domo****.* [FE.18] Komparu kun *dum*, kiu komence estis nur frazenkondukilo.

### *Kvankam*

*Kvankam* enkondukas subfrazon, kiu montras nesufiĉan kaŭzon aŭ nesufiĉan malhelpaĵon. *Kvankam*-frazo montras ion, kio ne sukcesas malhelpi la ĉeffrazan ideon:

- *Ŝi edziniĝis kun sia kuzo,* ***kvankam ŝiaj gepatroj volis ŝin edzinigi kun alia persono****.* [FE.39] Ŝi ja edziniĝis kun sia kuzo. La volo de la gepatroj ne povis malhelpi tion.
- *Ĉemizojn, kolumojn, manumojn kaj ceterajn similajn objektojn ni nomas tolaĵo,* ***kvankam ili ne ĉiam estas faritaj el tolo****.* [FE.35] Ni ja nomas ilin tolaĵo. La fakto, ke ili ne ĉiam estas el tolo, ne malhelpas tion.

Se *kvankam*-frazo staras komence, oni ofte por klareco uzas *tamen* (§14.3.17) en la ĉeffrazo:

- ***Kvankam la pasintaj tagoj povis ŝin prepari al tia sorto****, ĝi* <u>*tamen*</u> *estis surprizo.* [M.111]
- *Jes, iele tiel fariĝis, ke,* ***kvankam ŝi estis bone edukita kaj bela****, ŝi ne edziniĝis.* [M.102] Ŝi ne edziniĝis. Ŝia edukiteco kaj beleco ne povis malhelpi tion.

Neniam uzu *sed* (nek *kaj*) por helpi *kvankam*-frazon. Ne diru: **Kvankam mi ne volis tion,* ***sed*** *mi faris.** Diru: *Kvankam mi ne volis tion, mi tamen faris.* Aŭ: *Mi ne volis tion, sed mi tamen faris.*

Oni ofte uzas mallongigitajn *kvankam*-frazojn, en kiuj la ĉefverbo kaj ankaŭ aliaj aferoj mankas. Iafoje tiaj *kvankam*-frazoj apenaŭ ŝajnas esti subfrazoj plu:

- ***Kvankam blinda kaj maljuna****, li en la daŭro de tre mallonga tempo perfekte ellernis Esperanton.* [OV.247] *= Kvankam li estis blinda kaj maljuna ...*
- *La virino faris malkontentan mienon,* ***kvankam ne tiel koleran kiel antaŭe****.* [M.198] *= ... kvankam ŝi ne faris tiel koleran mienon kiel antaŭe.*
- *Nun nia urbo jam trankviliĝis,* ***kvankam ankoraŭ ne tute****.* [L1.102] *= ... kvankam ĝi ankoraŭ ne tute trankviliĝis.* La urbo ankoraŭ ne vere tute trankviliĝis, sed tio ne malhelpas, ke ni tamen diru, ke ĝi trankviliĝis.
- *Per la larmoj, kiuj antaŭ momento forte,* ***kvankam silente*** *fluis el ŝiaj okuloj, ŝi videble elploris parton de tiuj mordantaj sentoj.* [M.143] *= ... kvankam ili fluis silente ...* La mallongigita *kvankam*-frazo staras en pozicio, en kiu la plena *kvankam*-frazo apenaŭ povas troviĝi.
- *La larĝaj pupiloj rigardis kun profunda,* ***kvankam muta*** *plendo.* [M.194] *= ... kun plendo profunda, kvankam ĝi estis muta.*

- *Ĝi* [= la desegnaĵo] *prezentis belan,* ***kvankam malgrandan*** *artaĵon*[M.68] = *Ĝi prezentis artaĵon, kiu estis bela, kvankam ĝi estis malgranda.*

*Kvankam* tre similas al *malgraŭ* (§12.3.6.6). La diferenco estas, ke *kvankam* enkondukas subfrazon, dum *malgraŭ* estas rolmontrilo, kiu staras antaŭ O-vorta aŭ O-vorteca frazparto: *Ili rifuzis helpi,* ***kvankam mi petegis***. = *Ili rifuzis helpi* ***malgraŭ mia petego***.

Sed ankaŭ *malgraŭ* povas enkonduki subfrazon kun helpo de *ke* aŭ *tio ke*: *Ili rifuzis helpi* ***malgraŭ (tio), ke mi petegis***. La esprimo *malgraŭ (tio) ke* (§12.3.6.6) estas malpli kutima, kaj tial pli emfaza ol *kvankam*.

Ekzistas ankaŭ la eĉ pli forta esprimo *spite ke*, kiu montras intencan kontraŭstaron: *Ili rifuzis* ***spite ke mi petegis***. Vidu ankaŭ la rolvortaĵon *spite al* (§12.3.7). Ankaŭ *eĉ* + *se* (§33.5) povas iafoje havi similan signifon. *Eĉ* + *se* montras, ke estus surprize, se la afero ne povus malhelpi: *Ili rifuzus,* ***eĉ se mi petegus***.

> **Noto:** En la frua tempo Zamenhof uzis *kvankam* kiel E-vortecan vorteton en ĉeffrazo: *Li estis* ***kvankam*** *konvinkita, ke li pro si ne devas timi, tamen li preferis antaŭe sendi alian personon, por vidi, kiel la afero staras.*[FA1.108] = *Kvankam li estis konvinkita, ke ...* Tiu stranga uzo nun tute malaperis.

### *Kvazaŭ*

*Kvazaŭ* = "tiel kiel estus se". *Kvazaŭ* povas enkonduki subfrazon, kiu montras fantazian komparon:

- *Tie ili sidis kune,* ***kvazaŭ ili estus gefianĉoj***.[FA3.50] = *Ili sidis kune tiel, kiel estus, se ili estus gefianĉoj.* Ili ne estis gefianĉoj, sed ŝajnis tiel.
- *Li estis ankaŭ bona homo, sed tiel koleriĝema,* ***kvazaŭ li havus en si pipron kaj tabakon***.[FA1.21] Li ne havis en si pipron kaj tabakon. Nur ŝajnis tiel.
- *Ŝi kuris al li renkonte,* ***kvazaŭ ŝi volus lin kisi***. *Ŝi tion ne faris, sed ŝi preskaŭ jam estis faronta tion.*[FA3.59]
- *La ĉielo aspektis,* ***kvazaŭ ĝi estus balaita***.[FA3.26]
- *Estas al mi* ***kvazaŭ mi sonĝus***.[BV.84]

*Kvazaŭ*-frazo estas ofte helpata de *tia*, *tiel*, *tiamaniere* aŭ *tiumaniere* en la ĉeffrazo:

- *Mi havas <u>tian</u> senton* ***kvazaŭ mi kisus mian patrinon!***[FA2.26] = *Mi havas tian senton, kian mi havus, se mi kisus mian patrinon.*
- *Li rakontis tion <u>tiel</u> klarbilde,* ***kvazaŭ tio okazus nun antaŭ iliaj okuloj***.[FA2.149]
- *Dum momento ŝi iris <u>tiamaniere</u>,* ***kvazaŭ ŝi ne scius bone, kien ŝi iras***.[M.184]

En ĉi tiaj *kvazaŭ*-frazoj Zamenhof ofte uzis la realan modon (verbon kun AS, IS aŭ OS): *De li iras tia odoro, kvazaŭ li ĵus* ***eliris*** *el brandfarejo.*[Rz.8] Tio ne estas erara, ĉar jam *kvazaŭ* montras la imagecon sufiĉe klare. Oni uzu tamen normale la imagan modon, US-formon. Sed, se *kvazaŭ*-frazo iel redonas ies penson, tiam oni plej ofte ja uzu la realan modon. Tiam temas pri

nerekta parolo, en kiu oni ĉiam uzu la verboformon de la iama penso aŭ diro (§33.8.1): *Ŝi havis la senton, kvazaŭ tio* **estas** *ŝia arbo.* [FA3.46]

*Kvazaŭ* (§14.3.12) ofte rolas kiel E-vorteca vorteto (kiu tute ne enkondukas subfrazon). Tiam oni normale uzas nur la realan modon: *Li parolis* ***kvazaŭ*** *robote.*

La vorteto *kvazaŭ* aperis nur en 1889. Tial en la unua tempo (kaj ankoraŭ iafoje post 1889) oni uzis *kiel se* (iafoje solan *kiel*) por enkonduki nereal-ecajn subfrazojn:

- *Estis al ŝi,* ***kiel se ambaŭakra glavo trairus tra ŝia delikata korpo****.* [FA1.97] = *... kvazaŭ ambaŭakra glavo trairus ...*
- *Ŝi rigardadis la vizaĝon de la fratino,* ***kiel se ĝi estus la vizaĝo de ĉiela anĝelo****.* [BV.35] = *... kvazaŭ ĝi estus la vizaĝo ...*

Tia uzo de *kiel (se)* nun malaperis. Oni uzas ĉiam *kvazaŭ*. Sed oni ja povas iafoje uzi *kiel* antaŭ *se*-frazo, kiu montras ion eblan, ion teorian. Tio estas alia signifo, por kiu oni ne povas uzi *kvazaŭ*: *Li sentis tian doloron,* ***kiel se*** *iu estas pikata de najlo.* Oni komparas kun afero, kiu ja iafoje okazas. Oni uzas la realan modon (AS-finaĵon). *Kvazaŭ* ne estas ebla. En tiaj frazoj oni povas ankaŭ uzi *kiam* anstataŭ *se*. Komparu kun: *Li sentis tian doloron,* ***kvazaŭ*** *li estus pikata de najlo.* La komparo estas fantazia, neniu lin pikas per najlo. Tial oni uzas *kvazaŭ* kun imaga modo (US-finaĵo).

### *Ol*

*Ol* povas enkonduki tempan subfrazon, se antaŭ la subfrazo staras la vorteto *antaŭ*:

- ***Antaŭ ol li atingis sian celon****, la suno subiris.* [FA2.12] = *Pli frue ol tiam, kiam li atingis ...*
- ***Antaŭ ol vi venos al mi****, li diros al mi la veron.* [FE.24] = *Pli frue ol tiam, kiam vi venos al mi ...*
- *Mi ne manĝos,* ***antaŭ ol mi diros mian aferon****.* [Gn.24] = *Mi ne manĝos pli frue ol tiam, kiam mi diros mian aferon.*

*Ol* plej ofte montras komparojn (§20.1) kunlabore kun *pli* aŭ *alia*. Ankaŭ en *antaŭ ol* temas pri komparo. Oni komparas du tempojn. Unu el tiuj tempoj estas pli frua, do antaŭa.

Logike oni povus ankaŭ uzi *antaŭ kiam*, same kiel oni uzas *post kiam* (§33.4.2). Alternative oni povus same logike uzi *post ol* anstataŭ *post kiam*. Sed jam delonge estas kutimo uzi *antaŭ ol* kaj *post kiam*. Ambaŭ estas logikaj. Logikaj estus ankaŭ *antaŭ ke* (= *antaŭ tio ke*), kaj *post ke* (= *post tio ke*), sed tiuj esprimoj ne estas praktike uzataj. Estas rekomendinde uzi *antaŭ ol* kaj *post kiam*, ĉar ili estas plej facile komprenataj ĝuste pro sia kutimeco.

Se la ĉeffrazo kaj la subfrazo havas la saman subjekton, oni povas anstataŭ subfrazo uzi *antaŭ ol* + I-verbon (§27.5).

*Ol* ankaŭ povas enkonduki subfrazon, en kiu *kiom* estas subkomprenata (§33.4.3).

## 33.8. Nerekta parolo

Nerekta parolo estas subfrazo, kiu rerakontas ies diron, penson, opinion, decidon, demandon, rimarkon k.s. Ofte oni devas iom ŝanĝi la formon de la origina diro aŭ penso. Nerekta parolo diferencas de rekta parolo, t.e. senŝanĝa citaĵo, kiu ne estas subfrazo, kaj kiu do ne havas frazenkondukilon. Rekta parolo ofte aperas inter citiloj kaj post dupunkto.

| | |
|---|---|
| **Rekta parolo:** | *Petro diris: "**Mi volas doni ion al vi.**"* |
| **Nerekta parolo:** | *Petro diris, **ke li volas doni ion al mi**.* |
| **Rekta parolo:** | *Karlo demandis: "**Ĉu vi volas iri kun mi?**"* |
| **Nerekta parolo:** | *Karlo demandis, **ĉu mi volas iri kun li**.* |

Nerekta parolo ordinare estas *ke*-frazo aŭ demanda subfrazo. Tia subfrazo plej ofte rolas kiel objekto de verbo kiel *diri*, *krii*, *pensi*, *scii*, *decidi*, *skribi*, *kompreni*, *rimarki*, *vidi*, *demandi*, *voli*, *aŭdi* k.t.p.: *Li diris, **ke li estas feliĉa**. Ŝi pensis, **ke ŝi estas feliĉa**.*

Nerekta parolo ankaŭ aperas kiel priskribo de vortoj kiel *penso*, *decido*, *demando*, *timo* k.t.p.: *Li havis la penson, **ke li estas feliĉa**. La decido estis, **ke Petro estu prezidanto**. Ili faris la demandon, **ĉu ili povas partopreni**.*

Nerekta parolo ankaŭ aperas kiel subjekto de *ŝajni*, *esti evidente*, *esti klare*, *esti (ne)eble*, *esti verŝajne* k.s.: *Ŝajnis, **ke pluvas**. Estis evidente, **ke li ne estas feliĉa**.*

Iafoje alispeca subfrazo aŭ eĉ I-verbo povas esti nerekta parolo.

En nerekta parolo oni povas heziti pri:

- Verboformo (§33.8.1)
- Tempaj kaj lokaj esprimoj (§33.8.2)
- Pronomoj (§33.8.3)

### 33.8.1. Verboformoj en nerekta parolo

En iuj lingvoj oni devas ĉe nerekta parolo iafoje ŝanĝi la verboformon. En Esperanto oni ĉiam konservas la originan verboformon:

- *Li diris: "Mi **volas** manĝi". → Li diris, ke li **volas** manĝi.* La AS de *volas* estas la nuno de la origina dirado. Ne ŝanĝu al IS.
- *Ĉu vi diris: "Mi **estas** feliĉa." → Ĉu vi diris, ke vi **estas** feliĉa?* La AS de *estas* montras la nunon de la origina dirado.
- *Li diris: "Mi tiam **loĝis** en Ĉinio." → Li diris, ke li tiam **loĝis** en Ĉinio.* La IS de *loĝis* montras tempon pli fruan ol la origina dirado. Estus eraro ŝanĝi al *estis loĝinta*.
- *Ĉu vi diris: "Mi **estis** feliĉa antaŭe." → Ĉu vi diris, ke vi **estis** feliĉa antaŭe?* La IS de *estis* montras tempon antaŭ la origina dirado.
- *Ŝi demandis: "Ĉu vi **iros** kun mi al kinejo?" → Ŝi demandis, ĉu mi **iros** kun ŝi al kinejo.* La OS de *iros* montras tempon postan al la origina de-

mando. Estus eraro ŝanĝi al *estis ironta* aŭ *volis iri*. Se la origina demando estus *"Ĉu vi **volas iri** kun mi?"*, oni dirus: *Ŝi demandis, ĉu mi **volas iri** kun ŝi.*

- *Li demandis: "Kion vi **faros** lunde?" → Li demandis, kion mi **faros** lunde.* La OS de *faros* montras tempon post la origina demandado. Eble la lundo nun jam pasis, eble ĝi ankoraŭ ne alvenis.
- *Mi sciis la respondon al la demando: "Kiam li **venos**?" → Mi sciis, kiam li **venos**.* La OS de *venos* montras tempon post la origina demando.
- *Li ne komprenis: "Kial ŝi ne **volas** partopreni?" → Li ne komprenis, kial ŝi ne **volas** partopreni.* La AS de *volas* montras la tempon de la origina demando.
- *Ili ordonis: "**Paku** tuj vian valizon!" → Ili ordonis, ke mi tuj **paku** mian valizon.*
- *Ŝi esperis, ke ŝi ilin **trovos**.* [FA1.161] La origina penso estis: *"Mi ilin **trovos**."*
- *Mi volas ke vi tien **iru**.* [FE.19] Mi volas diri: *"**Iru** tien!"*
- *Ke li **estas** malsana, ŝi tuj rimarkis.* [FA1.119] Ŝi pensis: *"Li **estas** malsana."*
- *Oni vidis, ke la junaj homoj **donas** al si reciproke la manojn.* [M.139] Oni vidis la aferon kaj konstatis: *"La junaj homoj **donas** ..."*
- *Subite li aŭdis, ke iu **alrajdas** de la vojo al la domo.* [FA1.15] Li aŭdis la sonon, kaj pensis: *"Iu **alrajdas** ..."*
- *Mi antaŭsentis, ke vi hodiaŭ vespere **venos**.* [FA3.61] Ŝi pensis: *"Hodiaŭ vespere li venos."*
- *Ŝi estis plena de timo, ke la infano **mortos**.* [FA3.1] Ŝi timis kaj pensis: *"La infano **mortos**!"*
- *Li metis la kondiĉon, ke oni ne **instruu** al ŝi la Kristanan religion.* [FA3.102] Li diris: *"Ne **instruu** al ŝi ..."*
- *Ŝajnis al ŝi, ke ŝin **ĉirkaŭas** unu sola densa barilo el traboj.* [FA1.163] Ŝi pensis: *"Min **ĉirkaŭas** ..."*, ĉar tiel ŝajnis al ŝi.
- *Ŝajnas, ke ĉio **havos** bonan finon.* [Rz.39] La parolanto opiniis: *"Ĉio **havos** bonan finon"*, ĉar tiel ŝajnis al li.
- *En lia animo estis tute klare, ke Kristino **devas** fariĝi lia edzino.* [FA3.91] Li pensis klare: *"Kristino **devas** fariĝi mia edzino."*

## Rilataj KI-frazoj

Rilataj subfrazoj (subfrazoj kun rilata KI-vorto) normale ne rerakontas diron aŭ penson. En tiaj subfrazoj la verbotempoj do rilatas al la absoluta nuno:

- *Mi ne konis tiun, kiu **venis**. Konis* kaj *venis* ambaŭ montras tempon antaŭ la nuno. Verŝajne ili montras la saman tempon.
- *Mi ne konis tiun, kiu **estis veninta**.* Kaj *konis* kaj *estis* montras tempon antaŭ la nuno. *Veninta* montras tempon ankoraŭ pli fruan.
- *Mi ne konis la personon, kiu **estis** baldaŭ **venonta** tra la pordo.* Kaj *konis* kaj *estis* montras tempon antaŭ la nuno. *Venonta* montras tempon post tiu pasinta tempo.

## Nerekta parolo en alispecaj subfrazoj

Normale nerekta parolo aperas en *ke*-frazoj aŭ demandaj subfrazoj, sed iafoje ankaŭ alispeca subfrazo povas esti rerakontado de diro aŭ penso:

- *Jam en Kjöge li volis aĉeti por ŝi oran ringon, sed post pripenso li tion ne faris, ĉar en Kopenhago oni ja certe* ***ricevos*** *multe pli belan.* [FA3.59] Li pensis: *"En Kopenhago oni ja certe* ***ricevos*** *multe pli belan."* La *ĉar*-frazo estas nerekta parolo. La OS-formo montras tempon post lia penso.

*Kiel*-frazo kelkfoje estas rerakontado de ies penso:

- *Li konfesis al ŝi, kiel kore li ŝin* ***amas****.* [FA3.61] Li diris pli-malpli: *"Mi vin tiel kore* ***amas****!"*
- *Ili sidis antaŭ li kaj vidis, kiel li per la fingroj* ***glatigas*** *kaj* ***formas*** *la molan argilon.* [FA4.150] Ili vidis kaj pensis: *"Tiel li* ***glatigas*** *kaj* ***formas*** *la molan argilon."* Komparu kun: *Mi vidis, kiel rozujo* ***ricevis*** *burĝonon.* [FA1.232] Ĉi tie oni ne volis rerakonti ian penson, sed nur rakonti, kio okazis. Tial estas IS-formo, kiu rilatas al la absoluta nuno.

*Kvazaŭ*-frazo povas redoni ies penson aŭ impreson. *Kvazaŭ* montras, ke la penso aŭ impreso estas malvera, ŝajna. En aliaj *kvazaŭ*-frazoj oni normale uzas US-verbon (§33.7), sed se estas nerekta parolo, oni ĉiam uzu la originan verboformon, kiu plej ofte estas en reala modo (AS, IS aŭ OS):

- *Li havis la impreson, kvazaŭ la luno* ***lumas*** *en la ĉambron, sed la luno tute ne lumis.* [FA3.14] Li pensis: *"La luno* ***lumas*** *en la ĉambron."*
- *Li havis la senton, kvazaŭ la rimeno de lia tornistro lin* ***premas****.* [FA3.64] Li pensis: *"La rimeno de mia tornistro min* ***premas****."* Sed tiel ne estis.
- *Ili* [...] *faris mienojn kvazaŭ ili* ***laboras****, sed havis nenion sur la teksiloj.* [FA1.108] Per siaj mienoj ili ŝajnigis: *"Ni* ***laboras****."* La homoj pensis: *"Ili* ***laboras****."*
- *Ŝajnis, kvazaŭ li* ***dormas****.* [FA1.59] Li ne dormis, sed estis mortinta. Al tiu, kiu lin vidis, tamen venis en la kapon la ideo *Li dormas*, kvankam li sciis, ke tio ne estas vero. La frazo redonas tiun penson kun la sama verboformo.
- *Sonis kvazaŭ ranoj* ***kvakas****.* [FA2.133] Oni pensis: *"Ranoj* ***kvakas****."* Sed estis io alia.

Tiaj ĉi *kvazaŭ*-frazoj estis oftaj ĉe Zamenhof. Nuntempe oni uzas plej ofte *ke*-frazojn, eble kune kun *kvazaŭ* kiel E-vorteca vorteto: *Li havis la impreson, ke la luno kvazaŭ lumas ... Ili faris mienojn, ke ili kvazaŭ laboras ... Ŝajnis, ke li kvazaŭ dormas.*

## I-verbo kiel nerekta parolo

Iafoje I-verba frazparto (I-verbo kune kun diversaj frazetoj) povas reprezenti *ke*-frazon, kiu rerakontas ies penson:

- *La maljuna ministro atente aŭskultis, por povi diri tion saman, kiam li* ***revenos*** *al la reĝo; kaj tiel li ankaŭ faris.* [FA1.109] La I-verbo *povi* egalas sence al *ke*-frazo: *... aŭskultis, por ke li povu diri tion saman, kiam li* ***revenos*** *al la reĝo ...* La ministro pensis: *"Mi povu diri tion saman, kiam*

*mi **revenos** al la reĝo."* Oni uzas *revenos* kun OS-finaĵo, kvankam fakte temas pri tempo antaŭ la absoluta nuno. Tio estas ebla, ĉar estas nerekta parolo.

### 33.8.2. Tempaj kaj lokaj vortoj en nerekta parolo

Se en citata frazo estas tempomontra esprimo, ĝi ofte povas resti senŝanĝe en nerekta parolo. Kelkaj tempaj vortetoj tamen dependas de la absoluta nuno, kaj devas tial iafoje ŝanĝiĝi por eviti konfuzon. Tiaj vortoj estas *hodiaŭ*, *hieraŭ*, *antaŭhieraŭ*, *morgaŭ* kaj *postmorgaŭ* (§14.2.4). Frazoj, en kiuj oni devas ŝanĝi tian tempovorton, estas tamen sufiĉe maloftaj:

- *Pasintan lundon li diris: "Mi ne laboros **hodiaŭ**!"*
  - ▹ *Pasintan lundon li diris, ke li ne laboros **tiun tagon**.* Se oni konservus *hodiaŭ* en la subfrazo, temus pri tiu tago, en kiu estis dirita la tuta frazo.
- *Morgaŭ li verŝajne diros: "Mi estis malsana **hieraŭ**!"*
  - ▹ *Morgaŭ li verŝajne diros, ke li estis malsana **hodiaŭ**.* Se oni uzus *hieraŭ* en la nerekta parolo, temus pri la tago antaŭ ol estis dirita la tuta frazo. Li efektive parolos pri la hodiaŭa tago, kaj oni do ŝanĝu al *hodiaŭ*.
- *Antaŭ unu semajno li demandis al mi: "Ĉu vi venos al mi **morgaŭ**?"*
  - ▹ *Antaŭ unu semajno li demandis al mi, ĉu mi venos al li **la postan tagon**.*
- *Antaŭhieraŭ li demandis: "Ĉu vi venos **morgaŭ**?"*
  - ▹ *Antaŭhieraŭ li demandis, ĉu mi venos **la postan tagon**.* Teorie oni povus diri: **Antaŭhieraŭ li demandis, ĉu mi venos **hieraŭ**.** Temas ja pri tiu tago, kiu estis antaŭ la nuna, do pri hieraŭ, sed la kontrasto inter OS-verbo kaj *hieraŭ* estas tro stranga.
- *Postmorgaŭ li diros: "Mi faris tion **hieraŭ**!"*
  - ▹ *Postmorgaŭ li diros, ke li faris tion **la antaŭan tagon**.* Teorie oni povus diri: **Postmorgaŭ li diros, ke li faris tion **morgaŭ**.** Sed la kontrasto inter IS-verbo kaj *morgaŭ* estas tro nekutima.

Iafoje en rakontoj oni tamen konservas *hodiaŭ*, *hieraŭ* kaj *morgaŭ* senŝanĝe: *Li renkontis konaton, junan poeton, kiu rakontis al li, ke **morgaŭ*** [= la postan tagon] *li komencos sian someran vojaĝon.* [FA1.133] Ĉi tiu frazo aperas en fabelo, kaj apenaŭ povus estiĝi konfuzo kun la vera morgaŭo.

Formoj kiel *hieraŭo*, *hieraŭa tago*, *morgaŭo*, *morgaŭa tago* (§14.2.4) estas ofte uzataj sendepende de la absoluta nuno.

La tempovorton *nun* oni povas iafoje por klareco ŝanĝi en nerekta parolo, sed plej ofte tio ne estas bezonata: *Hieraŭ li diris: "Mi volas fari tion **nun** kaj ne poste!"* → *Hieraŭ li diris, ke li volas fari tion **nun** kaj ne poste.* Oni povus ŝanĝi al *tiam*, *tiumomente* aŭ eble *tuj*, sed ankaŭ *nun* taŭgas. En rakontoj *nun* (§14.2.7) estas sufiĉe ofte uzata pri pasinta tempo.

Loka esprimo en citata frazo devas iafoje ŝanĝiĝi en nerekta parolo, se oni rerakontas la aferon en alia loko. Alifoje tia ŝanĝo povas esti natura, sed ne nepra:

- Karlo kaj Eva estas en Parizo. Karlo parolas pri Pekino, kaj diras al Eva: *Mi iros **tien**.*
  - ▷ Eva poste estas kun Petro en Pekino, kaj rerakontas al Petro: *Karlo diris, ke li iros **ĉi tien**.* (Aŭ eble pli bone: *... ke li **venos ĉi tien**.*)
- Petro kaj Eva estas en Tokio, kaj Petro diras al ŝi: *Mi iam estis **en Berlino**.*
  - ▷ Eva kaj Karlo poste estas en Berlino, kaj ŝi rerakontas al li: *Petro diris, ke li iam estis **ĉi tie**.* Aŭ: *Petro diris, ke li iam estis **en Berlino**.*

### 33.8.3. Pronomoj en nerekta parolo

En nerekta parolo personaj kaj posedaj pronomoj ofte devas ŝanĝiĝi, se la parolanto aŭ la alparolato ŝanĝiĝis:

- Karlo diras: ***Mi** estas tre feliĉa.*
  - ▷ Petro rakontas al Eva: *Karlo diris, ke **li** estas tre feliĉa. Mi → li.*
- Karlo diras: ***Mi** iros al **miaj** gepatroj.*
  - ▷ Petro rakontas al Eva: *Karlo diris, ke **li** iros al **siaj** gepatroj. Mi → li, miaj → siaj.*
- Karlo demandas al Petro pri Eva: *Ĉu **ŝi** volas kuniri kun **mi**?*
  - ▷ Petro redemandas al Karlo: *Ĉu vi demandis, ĉu **ŝi** volas kuniri kun **vi**? Ŝi* restas, *mi → vi.*
  - ▷ Petro rakontas al Eva: *Li demandis, ĉu **vi** volas kuniri kun **li**. Ŝi → vi, mi → li.*
- Karlo diras al Eva: ***Mi** amas **vin**.*
  - ▷ Petro demandas al Eva: *Ĉu li vere diris, ke **li** amas **vin**? Mi → li, vin* restas.
  - ▷ Petro demandas al Karlo: *Ĉu vi vere diris, ke **vi** amas **ŝin**? Mi → vi, vin → ŝin.*
  - ▷ Petro rakontas al Elizabeto: *Li fakte diris al **ŝi**, ke **li** amas **ŝin**. Mi → li, vin → ŝin.*
- Karlo diras al Petro pri Eva: ***Mi** amas **ŝin**.*
  - ▷ Petro rakontas al Eva: *Li diris, ke **li** amas **vin**. Mi → li, ŝin → vin.*
- Karlo diras al Petro pri si mem kaj Eva: ***Ni** geedziĝos.*
  - ▷ Petro demandas al Karlo: *Ĉu vi diris, ke **vi** geedziĝos? Ni → vi.*
    (La unua *vi* estas Karlo. La dua *vi* estas Karlo kaj Eva.)
  - ▷ Petro rakontas al Elizabeto: *Li diris, ke **ili** geedziĝos. Ni → ili.*

Iafoje *ni* inkluzivas la alparolaton, alifoje ne. Ofte la kunteksto montras la ĝustan signifon, sed je bezono oni uzu pli klaran esprimon:

- Karlo diras al Petro pri si mem, Petro kaj Eva: *Ĉu **ni** iru al la urbo? Ni* inkluzivas la alparolaton, kiu estas Petro.

- ▹ Petro redemandas al Karlo: *Ĉu vi demandis, ĉu* ***ni*** *iru al la urbo? Ni* restas kaj ankoraŭ inkluzivas la alparolaton, sed nun la alparolato estas Karlo.
- ▹ Petro rerakontas al Elizabeto: *Li demandis, ĉu* ***ni*** *iru al la urbo. Ni* ankoraŭ restas, sed ne plu inkluzivas la alparolaton, kiu nun estas Elizabeto. Por klareco Petro povus anstataŭe diri ekz.: *Li demandis, ĉu* ***mi, li kaj ŝi*** *iru al la urbo.*

• Karlo diras al Petro kaj Eva: *Venu kun* ***mi*** *al kinejo.*

- ▹ Petro rerakontas al Eva kaj Elizabeto: *Li proponis, ke* ***ni*** *venu kun* ***li*** *al kinejo.* La antaŭe subkomprenata *vi* fariĝis *ni*. *Ni* inkluzivas unu el la alparolatoj, Evan, sed ne la alian, Elizabeton. Ankaŭ estas eble diri pli klare: *Li proponis* ***al mi kaj Eva****, ke ni venu kun li al kinejo.*

**Noto:** En *PAG*, §234, oni skribis, ke oni ĉiam devas ŝanĝi ĉiujn pronomojn de la unua kaj dua personoj, *mi*, *ni*, *vi*, en la trian personon, *li*, *ŝi*, *ĝi*, *ili*. Tio ne estas vera. Iafoje estus erarego tiel ŝanĝi. Iafoje oni eĉ devas ŝanĝi en la kontraŭa direkto. Vidu la diversajn ekzemplojn ĉi tie.

# 34. Vortordo

En Esperanto la ĉefa regulo de vortordo estas komprenebleco. Oni metu la vortojn en tia ordo, ke la senco estas klara. La diversaj finaĵoj, precipe N, ebligas grandan liberecon, sed la libereco ne estas absoluta. En tiu ĉi paragrafo temos ĉefe pri la ordo de frazpartoj.

### Aliaj reguloj pri vortordo

Multaj E-vortecaj vortetoj ordinare staru por klareco ĝuste antaŭ tio, al kio ili rilatas, ekz. *ankaŭ* (§14.3.6), *eĉ* (§14.3.9), *tre* (§14.3.18), *nur* (§14.3.14). Ankaŭ *ne* (§21) staru antaŭ tio, kion ĝi neas.

Rolvorteto (§12.3) staru ĉiam antaŭ tio, kies rolon ĝi montras.

Kunliga vorteto (§16) staru antaŭ tio, kion ĝi ligas al io.

*Ajn* (§14.3.4) staru tuj post tiu tabelvorto, kiun ĝi nuancas.

Legu ankaŭ pri la ordo de rektaj priskriboj de O-vortoj, A-vortoj kaj E-vortoj en §7.

## 34.1. Ordo de frazpartoj

La baza ordo de frazpartoj sekvas la ĉi-postan modelon:

**subjekto** – **ĉefverbo** – **objekto** – **aliaj frazpartoj**

- *La knabo – sidas.*
  subjekto – ĉefverbo
- *Ili – sidas – sur la sofo.*
  subjekto – ĉefverbo – loka komplemento
- *La hundo – ĉasas – katon.*
  subjekto – ĉefverbo – objekto
- *Karlo – manĝas – rizon – per manĝbastonetoj.*
  subjekto – ĉefverbo – objekto – ila komplemento
- *La virino – estas – arĥitekto.*
  subjekto – ĉefverbo – perverba priskribo de la subjekto
- *La ĉielo – fariĝis – malhela.*
  subjekto – ĉefverbo – perverba priskribo de la subjekto
- *Ĉiuj – opinias – lin – stranga.*
  subjekto – ĉefverbo – objekto – perverba priskribo de la objekto

Tiu modelo tamen ne validas por KI-vortoj, ĉar KI-vorton oni normale ĉiam metas unue en la frazo sendepende de ĝia frazrolo (§34.2.1).

Se oni uzas alian vortordon, oni ne ŝanĝas la bazan signifon, sed nur kreas diversajn emfazojn:

- *Sur la sofo sidas ili.* Atentigo, ke ĝuste ili sidas tie, ne iuj aliaj.
- *Sur la sofo ili sidas.* Atentigo, ke ili sidas ĝuste sur la sofo, ne aliloke.
- *Ĉasas katon la hundo.* Atentigo, ke ĝuste la hundo, ne iu alia, ĉasas katon.

- *Ĉasas la hundo katon.* Atentigo, ke ĝi ĉasas katon, ne ekz. rigardas.
- *Katon la hundo ĉasas.* Atentigo, ke ĝi ĉasas ĝuste katon, ne ekz. raton.
- *Rizon Karlo manĝas per manĝbastonetoj.* Atentigo, kiamaniere Karlo manĝas ĝuste rizon.
- *Arĥitekto la virino estas.* Atentigo, ke ŝi estas ĝuste arĥitekto.
- *Stranga ĉiuj opinias lin.* Atentigo, ke ili opinias lin ĝuste stranga.

Ĉe perverba priskribo (§25.1) oni tamen ne povas ĉiam tute libere ŝanĝi la vortordon, ĉar perverba priskribo plej ofte ne havas rolmontrilon. Tial iafoje oni povus konfuzi perverban priskribon kun subjekto. Estas diferenco inter *leono estas besto* (vero) kaj *besto estas leono* (malvero, ĉar ekzistas ankaŭ aliaj bestoj). En frazo kiel *lernanto fariĝis instruisto* la ordo estas tre grava, ĉar *instruisto fariĝis lernanto* estas tute alia afero. En plej multaj realaj frazoj kun perverba priskribo la kunteksto tamen forigas la eblojn de miskomprenoj, eĉ se oni uzas nekutiman vortordon. Sed frazo kiel **instruisto lernanto fariĝas** estas apenaŭ komprenebla, kaj tial evitenda.

Oni povas emfazi kaj nuanci ankaŭ alimaniere. Ekz. per la vorto *ja* (§14.3.10), kiu aldonas emfazon. Iafoje oni povas uzi prezentan ĉeffrazon plus rilatan subfrazon (§33.4.1.1). Parole oni povas aldoni elparolan emfazon al gravaj vortoj.

## 34.2. Antaŭmetado de frazparto

### 34.2.1. Normala antaŭmetado

Frazparton, kiu kutime ne aperas unue en frazo, oni povas emfazi per tio, ke oni ĝin metas ĝuste en tian komencan pozicion:

- ***Terure gajaj** ŝajnis al ili iliaj propraj ŝercoj.* [FA2.6] Normala vortordo estus: *Iliaj propraj ŝercoj ŝajnis al ili terure gajaj.*
- ***La sonorilon** mi volas kaj devas trovi!* [FA2.89] Normale: *Mi volas kaj devas trovi la sonorilon.*

#### KI-vortoj

Frazparto, kies ĉefvorto estas KI-vorto (§13.1), staras normale komence de sia ĉeffrazo aŭ subfrazo. Tia pozicio ne estas do aparte emfaza ĉe KI-vortoj. Antaŭ la KI-vorto povas tamen stari rolvorteto, kiu montras ĝian frazrolon:

- ***Kion** vi volas?*
- *Mi volas tion, **kion** vi volas.*
- ***De kio** tio ĉi venas, mia filino?* [FE.17]
- *Mi ankaŭ ne scias, **per kio** oni povas klarigi tiun fakton.* [M.85]
- *Ŝi ne sciis, **en kiu** flanko oni devas serĉi butiketon kun manĝeblaĵoj.* [M.11]
- *El la kaldrono, **en kiu** sin trovas bolanta akvo, eliras vaporo.* [FE.25]

Principe ankaŭ aliaj vortoj, kiuj kunlaboras kun la KI-vorto, povas stari antaŭ ĝi, sed oni ĝenerale malemas havi antaŭ KI-vorto ion, kio ne estas rolvorteto:

- ***Tuj kiam*** *la suno leviĝis, la cignoj kun Elizo forflugis de la insuleto.* [FA1.168]
- ***Sume kiom*** *mi ŝuldas?* [Rz.34] Oni povus meti *sume* aliloke en la frazo.
- ***Kune kun kiu*** *vi venis?* Oni normale forlasus *kune*.
- *La virino,* ***flanke de kiu*** *staras mia frato, estas mia edzino.* Pli nature estas diri *apud kiu*, aŭ eble *ĉe kies flanko*.

La kunligaj vortetoj *kaj* (§16.1), *aŭ* (§16.2) kaj *sed* (§16.3) povas senprobleme aperi antaŭ KI-vorto, ĉar tiaj vortetoj ne vere apartenas al la posta frazo, sed nur ligas ĝin al la antaŭa:

- *Dum la trarigardado mi trovis diversajn esprimojn, kiuj siatempe ŝajnis al mi bonaj,* ***sed kiuj*** *nun al mi ne plaĉas* ***kaj kiujn*** *mi volonte ŝanĝus.* [LR.146A]

Legu ankaŭ pri KI-demandoj en §22.1, pri KI-demandoj kiel subfrazoj en §33.3, kaj pri rilataj subfrazoj en §33.4.

### 34.2.2. Antaŭmetado el subfrazo

Iafoje oni povas meti frazparton, kiu vere apartenas al subfrazo, en la komencon de la tuta frazo. Tio kreas tre fortan emfazon pro la malkutimeco de la vortordo:

- ***Tiun laboron*** *mi diris, ke mi faros. = Mi diris, ke mi faros tiun laboron.* La frazparto *tiun laboron* estas objekto de *faros*, kaj apartenas plene al la *ke*-frazo. Por emfazo ĝi tamen staras komence de la tuta frazo.
- ***En salono Zamenhof*** *mi pensas, ke okazas nun la solena inaŭguro. = Mi pensas, ke okazas nun en salono Zamenhof la solena inaŭguro.* La loka komplemento ne montras la lokon de la pensado, ĉar ĝi vere apartenas al la subfrazo.
- ***El tio povas elveni****, la diablo scias,* ***kio****.* [Rz.9] En tiu ĉi tre nekutima frazo, ĉio el la subfraza demando, krom la demanda vorto *kio*, estas antaŭmetita. Normala vortordo estas: *La diablo scias, kio el tio povas elveni.*

Ofte povas estiĝi konfuzo, al kiu parto de la frazo vere apartenas antaŭmetitaj vortoj. Povas ŝajni, ke ili apartenas al la ĉeffraza verbo, ĉar ili ja staras pli proksime al ĝi. Tial tia ĉi vortordo estas tre malofte uzata (sed vidu ĉi-poste pri KI-vortoj). Se la frazparto, kiun oni volas emfazi, rolas kiel subjekto en sia subfrazo, oni nepre ne povas formovi ĝin, ĉar subjekto devas ĉeesti ĉe sia ĉefverbo. Nepre ne uzu: **Tiu laboro mi pensas, ke estas malfacila.** Oni devas diri: *Mi pensas, ke tiu laboro estas malfacila.*

### *Pri*-solvo

Iafoje, se la senco permesas, oni povas emfazi frazparton en subfrazo per uzo de antaŭmetita *pri*-komplemento. Tiun frazparton, kiun oni volas emfazi, oni lasas en ĝia loko en la subfrazo en la formo de pronomo aŭ tabelvorto, kaj en la komenco de la tuta frazo oni metas ĝin en la formo de *pri*-komplemento. La emfazata afero aperas do dufoje, unu fojon kiel *pri*-komplemento en la ĉeffrazo, kaj unu fojon pronome en sia vera frazrolo en la subfrazo:

- ***Pri tiu laboro** mi diris, ke mi faros ĝin. = Mi diris, ke mi faros tiun laboron.*
- ***Pri tiu tasko** mi pensas, ke ĝi estas malfacila.*
- ***Pri talento** mi neniam aŭdis, ke vi ian havas.* M.156 *= Mi neniam aŭdis, ke vi havas ian talenton.*

### Antaŭmetado de KI-vorto el subfrazo

Kiam oni faras KI-demandon, oni movas la pridemandatan aferon de sia normala loko al la komenco de la frazo:

- *Vi volas **ion**. → **Kion** vi volas?*
- *Li nomiĝas **Karlo**. → **Kiel** li nomiĝas?*

Se la tuta frazo enhavas en si subfrazon, kaj la pridemandota afero troviĝas en tiu subfrazo, oni devas, kiam oni formas demandan frazon, movi tiun aferon al la komenco de la tuta demanda frazo, kvankam ĝi ankoraŭ sence apartenas al la subfrazo. Tiaj frazoj povas fariĝi malfacile kompreneblaj:

- *Vi konsilas, ke ni respondu **ion** al ĉi tiu popolo. → **Kion** vi konsilas, ke ni respondu al ĉi tiu popolo* [...]*?* Kr1.12 *Kion* estas objekto de la ĉefverbo *respondu*, kvankam ĝi staras pli proksime al *konsilas*. La frazo sonas tamen sufiĉe nature, ĉar *kion* ankaŭ povus rilati al la ĉeffraza verbo *konsilas*.
- *Petro diris, ke lia amiko nomiĝas **Karlo**. → **Kiel** Petro diris, ke lia amiko nomiĝas?* Estas risko, ke oni pensas, ke *kiel* rilatas al *diris*, kio donus tre strangan signifon. Pli komprenebla alternativo estas: ***Kiel** laŭ Petro nomiĝas lia amiko?*
- *Vi deziras, ke mi agu **iel**. → **Kiel** vi deziras, ke mi agu?* Pli normala demando estas: *Kiel mi agu?* Sed tio ne signifas precize la samon.
- *Vi aŭdis, ke oni vendas **ion**. → **Kion** vi aŭdis, ke oni vendas?* Pli volonte oni dirus simple: *Kion oni vendas?* Sed tio ne estas precize la sama demando.
- *Vi volas, ke mi vendu **ion** al vi. → **Kion** vi volas, ke mi vendu al vi?* Pli simpla (sed ne tute samsenca) estas: *Kion mi vendu al vi?*

Oni plene evitu ĉi tiajn frazojn, se la subfrazo mem estas demando, ĉar tia konstruo fariĝas tro komplikita:

- *Ŝi demandis, ĉu mi ŝatas **muzikon**. → *Kion ŝi demandis, ĉu mi ŝatas?** Oni devas diri nur *Kion ŝi demandis?* kvankam tio estas malpli preciza, aŭ uzi la *pri*-solvon montrotan ĉi-poste.

- *Petro demandis, kiam mi iros* ***al la urbo***. → **Kien* *Petro demandis, kiam mi iros?** Eble oni devas kontentiĝi per *Kion Petro demandis?*

La sama problemo ekzistas ĉe rilataj (nedemandaj) KI-vortoj. Ankaŭ tiaj KI-vortoj estu en la komenco de la subfrazo. Se la rilata KI-vorto vere apartenas al subfrazo de la subfrazo, konfuzo povas estiĝi:

- *Vi asertis, ke vi vidis* ***homon***. → *La homo,* ***kiun*** *vi asertis, ke vi vidis, estas jam delonge mortinta.* Evitinda frazo, ĉar *kiun* ŝajnas esti objekto de *asertis*, kvankam ĝi vere estas objekto de *vidis*. (Ĉi tie oni povas uzi la elturniĝon *La homo, kiun vi asertis esti vidinta ...*)
- *Ŝi scius, kio estas kuirita* ***sur ĉiu fajrejo***. → *Ekzistis neniu fajrejo,* ***kie*** *ŝi ne scius, kio estas kuirita.* Evitinda frazo, ĉar *kie* ŝajnas montri la lokon de la sciado, dum ĝi fakte montras la lokon de la kuirado. Vidu zamenhofan solvon ĉi-poste.

## *Pri*-solvo ĉe KI-vortoj

Ofte oni povas elturniĝi per antaŭmetita *pri*-komplemento. Oni lasas la KI-aferon en ĝia loko en la formo de pronomo, kaj uzas *pri*-komplementon kiel demandesprimon aŭ frazenkondukilon:

- *Ŝi demandis, ĉu mi ŝatas* ***muzikon***. → ***Pri kio*** *ŝi demandis, ĉu mi ŝatas* <u>*ĝin*</u>*?*
- *Vi asertis, ke vi vidis* ***homon***. → *La homo,* ***pri kiu*** *vi asertis, ke vi vidis* <u>*lin*</u>*, estas jam delonge mortinta.*
- *Ŝi scius, kio estas kuirita* ***sur ĉiu fajrejo***. → *Ekzistis neniu fajrejo,* ***pri kiu*** *ŝi ne scius, kio estas kuirita* <u>*sur ĝi*</u>*.* [FA2.18]
- *Ŝajnis al mi, ke mi havas* ***prudenton***. → *Mia prudento,* ***pri kiu*** *ŝajnis al mi, ke mi* <u>*ĝin*</u> *havas, protestas.* [M.34]

Sed *pri*-solvo ne ĉiam funkcias:

- *Karlo renkontis tiun viron, kiu vendis* ***domon*** *al Elizabeto.* → **Elizabeto baldaŭ ekloĝos en la domo,* ***kiun*** *Karlo renkontis tiun viron, kiu vendis al ŝi.** La frazo estas tute nekomprenebla, sed *pri*-solvo ne helpas: **Elizabeto baldaŭ ekloĝos en la domo,* ***pri kiu*** *Karlo renkontis tiun viron, kiu vendis* <u>*ĝin*</u> *al ŝi.** La *pri*-solvo ne funkcias, ĉar *pri kiu* (= *pri la domo*) ĉi tie ne donas sencon. En tiu ĉi okazo oni povas anstataŭe elturniĝi per kompleta renverso de la origina frazo: ***La domon*** *vendis al Elizabeto tiu viro, kiun Karlo renkontis.* → *Elizabeto baldaŭ ekloĝos en la domo,* ***kiun*** *vendis al ŝi tiu viro, kiun Karlo renkontis.*
- *Vi deziras, ke aliaj agu kun vi* ***iel***. → **Agu kun aliaj en tia maniero,* ***pri kiu*** *vi deziras, ke aliaj agu kun vi* <u>*en ĝi*</u>*.** La *pri*-solvo estas tro komplikita. Efektive *kiel* bone povas rilati ankaŭ al *deziras*, kaj tial simpla kaj rekta KI-frazo bone funkcias: *Agu kun aliaj tiel,* ***kiel*** *vi deziras ke aliaj agu kun vi.* [OV.320]

## Ne movu subjekton for de ĝia verbo

Se la KI-afero rolas kiel subjekto, oni ne povas movi ĝin for el la subfrazo. La subjekto de verbo devas ĉeesti en sia frazo:

- *Karlo diris, ke **lia frato** edziĝis.* → ****Kiu** Karlo diris, ke edziĝis?** *Diris* ŝajnas havi du subjektojn, dum *edziĝis* ŝajnas tute ne havi subjekton. Uzu la *pri*-solvon: ***Pri kiu** Karlo diris, ke li edziĝis?*
- *Vi pensas, ke **tiu knabino** amas min.* → **Ŝi estas tiu knabino, **kiu** vi pensas, ke amas min.** Ĉi tie *pensas* ŝajnas havi du subjektojn (*kiu* kaj *vi*), kaj *amas* ŝajnas havi neniun subjekton. Diru: *Ŝi estas tiu knabino, **pri kiu** vi pensas, ke ŝi amas min.*
- *Mi diris, ke **Karlo** prenis la aŭton.* → **Jen estas Karlo, **kiu** mi diris, ke prenis la aŭton.** Diru: *Jen estas Karlo, **pri kiu** mi diris, ke li prenis la aŭton.*

## Disigo en plurajn frazojn

La plej bona maniero esprimi ĉi tiel malsimplajn aferojn ofte estas uzado de pluraj memstaraj frazoj, ekz.: *Vi asertis, ke vi vidis certan homon, sed tiu homo estas jam delonge mortinta. / Elizabeto baldaŭ ekloĝos en la domo. Karlo vidis tiun viron, kiu vendis ĝin al ŝi. / Karlo diris, ke iu edziĝis. Kiu estas tiu persono? / Vi pensas, ke iu knabino amas min. Ŝi estas tiu knabino. / Jen estas Karlo, kiu prenis la aŭton. Tion mi diris antaŭe.*

# 35. Propraj nomoj

## 35.1. Nomspecoj

### Normalaj propraj nomoj

Normala propra nomo estas O-vorto, kiu per si mem estas propra nomo: *Karlo*, *Petro*, *Berlino*, *Atlantiko*, *Japanujo*, *Nilo*, *Olimpo*. Kelkfoje tia nomo havas A-vorton aŭ alispecan priskribon, kiu estas parto de la nomo: *Nova Zelando*, *Norda Ameriko*, *Sankta Petro*, *la Sankta Biblio*, *La Nobla Korano*, *Nilo Blanka*, *Bulonjo-ĉe-Maro* (aŭ *Bulonjo ĉe maro*). Ĉe tiaj nomoj oni plej ofte **ne** uzas *la* (§9.1.6).

### Ordinaraj O-vortoj kiel propraj nomoj

Propra nomo ankaŭ povas esti ordinara O-vorto (kun aŭ sen priskriboj), kiu fariĝis propra nomo de io: *la Ruĝa Maro*, *la Sankta Virgulino*, *la Eternulo*, *la Fortuno*. Tia nomo povas ankaŭ esti O-vortece uzata A-vorto: *la Ĉiopova* (= Dio). Ĉe tiaj nomoj oni normale **ja** uzas *la* (§9.1.6).

### Citaĵaj propraj nomoj

Iafoje propra nomo ne estas O-vorto, sed alispeca vorto aŭ eĉ tuta frazo: *Amplifiki* (muzikensemblo), *Ajn* (poemaro), *Ĉu vi kuiras ĉine?* (romano). Oni povas nomi ilin citaĵaj propraj nomoj, ĉar ili estas normale traktataj kiel citaĵoj (§36). Al tiu ĉi grupo oni ankaŭ povas kalkuli ne-esperantigitajn nomojn sen O-finaĵo (§35.2): *Beijing*, *Shakespeare*, *Waringhien*.

### Multe-nombraj nomoj

Propraj nomoj normale estas unu-nombraj. Kelkaj nomoj, kiuj montras grupon de pluraj aferoj, estas tamen multe-nombraj: *Filipinoj* (insularo), *Andoj* (montaro), *Karolidoj* (familio). Legu ankaŭ pri *la* ĉe multe-nombraj propraj nomoj en §9.1.6.

### Ĉu esperantigi?

Propraj nomoj povas reteni sian originan, ne-Esperantan formon (§35.2), eventuale transskribitan per Esperantaj literoj, aŭ ili povas esti tute esperantigitaj (§35.3) kun Esperantaj finaĵoj. Ĉiu metodo havas siajn uzokampojn. Neniu el ili povas esti universale uzata.

## 35.2. Ne-esperantigitaj nomoj

Ne-esperantigitaj propraj nomoj estas utilaj en tiaj okazoj, kiam gravas rekono de la origina skriba formo. Tiaj originaj nomformoj povas tamen esti malfacilaj por elparolado, ĉar ne ĉiu homo povas scii la nacilingvan elparolon. Ofte estas do utile iel montri, kiel oni povas elparoli la nomon. Aŭ oni montru la originan elparolon (precize aŭ proksimume), aŭ oni montru esperantecan elparolon (§2.3).

Iafoje oni preferas konservi nomon senŝanĝe pro tute specialaj motivoj. Ekz. la vorton *Allah* por Dio oni nur transskribis per latinaj literoj en la Esperanta traduko de la Korano, ĉar tiu vorto estas konsiderebla kiel memprezento de

Dio, kaj tial neŝanĝenda. Aliaj tradukantoj elektus traduki per la vorto *Dio*, ĉar la araba *Allah* signifas ĝuste "(la) Dio". Tiaj elektoj estas afero de persona opinio, kaj ili ne koncernas la Esperantan gramatikon.

## Ne-latinaj skriboj

Se la origina nomformo estas skribata per alia alfabeto ol la latina, oni normale transskribas la nomon per latinaj literoj. Tiam oni povas uzi oficialan (aŭ ofte uzatan) manieron transskribi el la origina lingvo, aŭ oni povas transskribi laŭ la Esperanta alfabeto. Oni elektu transskribon taŭgan laŭ la cirkonstancoj. Se la eblo elparoli estas tre grava, skribo laŭ la Esperanta alfabeto (aŭ eĉ plena esperantigo) povas esti preferinda. Se rekono de la skriba formo estas grava, verŝajne ia transskribo laŭ oficiala sistemo estas pli bona, kaj tiam en iaj specialaj okazoj eĉ povas esti inde reteni la originan nelatinliteran skribon (se tio estas ebla), sed tiam ordinare oni uzu apude ankaŭ latinliteran formon.

## Finaĵoj

Ne-esperantigitaj nomoj povas aperi O-vortece sen O-finaĵo:

- ***Zminska** meditis momenton.* [M.30] Pola nomo rolas kiel subjekto.
- ***Zamenhof** estis la iniciatinto de Esperanto.*
- *Ni trinku glason pro la memoro **pri Bartel Thorwaldsen**!* [FA2.112] Dana nomo rolas kiel *pri*-komplemento.

Ĉe ne-esperantigita propra nomo, kiu finiĝas per vokalo, oni povas je bezono rekte aldoni N-finaĵon. Alie oni povas aldoni kaj O-finaĵon kaj N-finajon, kiam la frazrolo tion postulas:

- *Ĉu vi konas **Annan**?* La ne-esperantigita nomo *Anna* facile akceptas N-finaĵon.
- *Ĉu vi konas **Elisabeth-on**?* La nomo *Elisabeth* bezonas O-finaĵon por povi akcepti la finaĵon N.
- *Rakontas **Christen Pedersen**. Ĉu vi konas **Christenon Pedersen**?* [FA3.114] Unue la nomo aperas kiel subjekto, sen Esperantaj finaĵoj. Poste ĝi aperas kiel objekto. Tiam Zamenhof aldonis O al la antaŭnomo por povi uzi ankaŭ N-finaĵon.
- *Li surĉevale rajdis tra la profunda vala vojo, por veni en **Weimaron** kaj viziti **Molly'n**.* [FA3.143]

Sed ĉe ne-esperantigitaj nomoj oni ankaŭ povas simple forlasi la N-finaĵon. Plej ofte la senco tamen restas klara:

- *Elizabeto vidis **Peter**.* La nomo *Peter* estas objekto, sed la parolanto preferis ne uzi N-finaĵon. La senco estas tamen klara, ĉar *Elizabeto* ne havas N-finaĵon. Tiu nomo devas esti subjekto. Se ĝi estus objekto, ĝi nepre havus N-finaĵon.
- *Marta komencis ludi. Ŝi ludis **la Prière d'une vierge**.* [M.27] Kaj la nomo *Marta*, kaj la nomo de la franca muzikpeco aperas sen N-finaĵo. La senco estas tamen klara, ĉar ordinare homo ludas muzikpecon, ne inverse.

- *Elisabeth renkontis Peter*. Ĉi tie la frazo estas malklara, ĉar ambaŭ nomoj estas ne-esperantigitaj, kaj neniu el ili havas N-finaĵon. Por certeco estas pli bone aldoni N al la objekto. Sed oni tamen rajtas supozi, ke *Peter* estas objekto, ĉar la plej ofte uzata vortordo estas **subjekto – ĉef-verbo – objekto** (§34.1).
- *Li renkontis **prezidanton Vigdís Finnbogadóttir***. Ĉi tie aperas la titolo *prezidanton* antaŭ la propra nomo. En tiaj okazoj nur la titolo havu N-finaĵon, kaj la propra nomo estu sen N-finaĵo. Se oni ne volas uzi N-finaĵon ĉe propra nomo, oni iafoje povas elturniĝi per titolo aŭ alia simila esprimo (§25.2): *Elisabeth renkontis **sian amikon Peter***.

Ofte oni esperantigas nur la antaŭnomon de persono, aŭ aldonas O-finaĵon al la ne-esperantigita formo de la antaŭnomo, sed lasas eventualan postan nomon en origina formo sen Esperanta finaĵo. N-finaĵon oni tiam uzas nur ĉe la antaŭnomo. Tio tamen ne estas regulo, nur kutimo: *Christenon Pedersen* (normale ne: *Christenon Pedersenon*).

Kiam fremda nomo estas uzata en frazrolo, kiu bezonas A-finaĵon aŭ E-finaĵon (aŭ eĉ verban finaĵon), oni devas aldoni tian finaĵon:

- *La malnova **Wartburga** kastelo ĉiam ankoraŭ staris senŝanĝe alte supre sur sia roka altaĵo.* FA3.145
- *Tio estas **zamenhofa** esprimo.*

Ofte oni povas anstataŭe elturniĝi per rolvorteto: *la malnova kastelo **de Wartburg***.

### Nur originaj formoj

Kiam oni uzas ne-Esperantan nomformon en Esperanto, oni ne uzu formon el ne-origina lingvo. Parolante pri ekz. la dana ĉefurbo, oni ne uzu **Kopenhagen** (la germanan formon), nek **Copenhague** (la francan formon). Uzu la danan formon *København*, aŭ la Esperantan formon *Kopenhago*. Parolante pri la ĉina filozofo *Kongzi* oni ne nomu lin **Confucius** (la latina formo). Uzu la ĉinan formon *Kongzi*, aŭ la Esperantan formon *Konfuceo*. Aliflanke, se oni scias nur neoriginan formon de nomo, kaj ne havas eblon trovi la originan formon aŭ esperantigitan formon, tiam oni ja nur povas uzi tiun formon, kiun oni scias.

### Elparolo

Kiam oni uzas nacilingvan nomon en Esperanta parolo, oni ne elparolu ĝin laŭ la maniero de alia nacia lingvo. Aŭ oni uzu la originan elparolon, almenaŭ proksimume, aŭ oni elparolu esperantece. Parolante pri ekz. la angla urbo *Winchester* oni elparolu aŭ anglece *"ŭinĉestr"*, aŭ esperantece (*"vinĉester"*), aŭ oni plene esperantigu (ekz. *Vinĉestro*°). Legu pli detale pri elparolado de ne-Esperantaj vortoj en §2.3.

## 35.3. Esperantigitaj nomoj

Kiam oni esperantigas propran nomon, oni povas fari tion parte aŭ plene. Oni povas ekz. transskribi la nomon per Esperantaj literoj konservante laŭ-

eble la originan elparolon. Oni ankaŭ povas transskribi uzante nur tipe Esperantajn kombinojn de literoj kaj sonoj. Aŭ oni povas plene esperantigi kun nur Esperantaj sonkombinoj kaj kun Esperantaj finaĵoj. Ĉi tie estos klarigoj ĉefe pri plene esperantigitaj nomoj.

Plene Esperantajn formojn povas elparoli ĉiu, kiu lernis Esperanton. Oni ne bezonas sciojn de aliaj lingvoj. Tiaj nomoj estas ankaŭ senprobleme uzeblaj kun ĉiaj Esperantaj finaĵoj. Plene esperantigitaj nomoj estas do utilaj en tiaj okazoj, kiam gravas la eblo elparoli la nomon, kaj la eblo uzi ĝin libere en ĉiaj frazoj. Sed se nomo ne estas tre konata, tiam plene esperantigita formo ne estas ĉiam rekonebla.

Legu ankaŭ pri la uzo de *la* ĉe propraj nomoj en §9.1.6.

### Kutimaj esperantigoj

Oni kutimas plene esperantigi ĉiujn nomojn de landoj (§35.4), nomojn de monde aŭ Esperante konataj urboj kaj montoj, nomojn de historiaj personoj, kaj nomojn de internaciaj aferoj, ekz. maroj kaj riveroj, kiuj fluas tra pluraj landoj. Uzi ne-esperantigitajn formojn por tiaj aferoj estas iafoje preskaŭ eraro, alifoje nur malrekomendinde:

- *Moçambique* (afrika lando) → *Mozambiko*
- *New York* (usona urbo) → *Nov-Jorko*
- *Beijing* (ĉefurbo de Ĉinio) → *Pekino*
- *Boulogne-sur-Mer* (grava urbo por Esperanto) → *Bulonjo-ĉe-Maro*
- *Caesar* (imperiestro de la roma regno) → *Cezaro*
- *Kongzi* (ĉina filozofo) → *Konfuceo*

Ofte eĉ ne ekzistas alternativo al la Esperanta formo, ĉar la afero ne apartenas al certa lando aŭ lingvo, ekz.: *Afriko* (kontinento), *Pacifiko* (oceano), *Gango* (rivero).

### N-finaĵo ĉe esperantigitaj nomoj

Plene esperantigitaj nomoj kun O-finaĵo ricevas N-finaĵon laŭ la ordinaraj reguloj:

- *Mi konas **Johanon**.* [FE.8] La propra nomo *Johano* rolas kiel objekto (§12.2.2).
- *Mi vojaĝas en **Hispanujon**.* [FE.26] La landnomo *Hispanujo* ricevas N-finaĵon por direkto (§12.2.5).

Se plene esperantigita nomo konsistas el pluraj sinsekvaj O-vortoj, ekzemple persona nomo plus familia nomo, kaj se la nomo devas havi N-finaĵon, tiam oni aldonas N-finaĵon al ĉiu el la O-vortoj:

- *Al s-ro D. ŝajnis, ke la homaranoj metas Hillelon pli alta ol **Jesuon Kriston**.* [OV.329] La duvorta nomo *Jesuo Kristo* rolas kiel objekto.
- *Tiu konsilisto ĵus ĉe la Patriarĥa mortigis **Miĉjon Berliozon**.*

Se parto de nomo estas ne-esperantigita, ne estas necese aldoni N-finaĵon al tiu nomparto: *Poste la morto rabis al ni **Jozefon Wasniewski**.* [OV.365] La tuta

nomo *Jozefo Wasniewski* rolas kiel objekto, sed la fina parto, la ne-esperantigita familia nomo, aperas sen N-finaĵo.

## Sur kio bazi esperantigon?

Multaj nomoj havas diversajn formojn en diversaj lingvoj, precipe nomoj de lokoj. Kiam oni kreas Esperantan formon, estas rekomendinde deiri de la plej internacie konata formo, aŭ almenaŭ de formo tre konata internacie. Uzi nur loke konatan formon kiel bazon, ne estas eraro, sed povas esti strange en internacia lingvo.

Ekz. estas preferinde uzi la formon *Kazablanko*° por la granda havenurbo en Maroko, ĉar ĝi estas tutmonde konata kiel "Casablanca". Surbaze de la araba nomo "*ad-Dar al-Bayda*" oni kreis la alternativan formon **Daralbajdo**°, kiu estas malrekomendinda, ĉar internacie malpli rekonebla.

Alia ekzemplo estas la lando *Finnlando*. En la tuta mondo ĝi estas konata sub diversaj variantoj de tiu nomo. Nur en Finnlando mem kaj en kelkaj najbaraj landoj ĝi havas alian nomon. Tiu nomo donis la alternativon **Suomio**, kiu estas tute maltaŭga en internacia lingvo. (Cetere la finnaj esperantistoj mem preferas la nomon *Finnlando*.) Simile evitinda estas **Nipono** anstataŭ la normala *Japanujo* (aŭ *Japanio*).

Tamen ne ekzistas devigaj reguloj, kiel elekti bazon de esperantigo. En ĉiu okazo oni elturniĝu en oportuna maniero. Ne ekzistas ĝenerala principo, kiu povas decidi en ĉiu okazo.

Se jam ekzistas tradicia Esperanta formo, oni nepre ne provu ŝanĝi ĝin sen tre forta motivo. Ekz. la ĉefurbo de Pollando nomiĝas en Esperanto dekomence *Varsovio*. Tio eble ne estas la plej internacia formo, sed ŝanĝo al ekz. **Varŝavo**° estus tute senutila rompo kun la tradicio. La lando *Kimrujo* havas en Esperanto nomon, kiu baziĝas sur tute neinternacia formo, sed oni ne provu ĝin ŝanĝi, ĉar ĝi estas firma parto de la Esperanta tradicio.

## Virinaj nomoj

Multaj pensas, ke virinaj nomoj sonas strange kun O-finaĵo pro influo de diversaj lingvoj, en kiuj O estas vira finaĵo, kaj A estas ina. Tial oni ofte uzas virinajn nomojn kun A-finaĵo, kvankam ili estas O-vortoj. Tio estas tute bona, se la nacilingva formo finiĝas per A, ĉar oni povas rigardi la nomon kiel ne-esperantigitan. Sed uzi Esperantan A-finaĵon en vorto, kiu el ĉiuj vidpunktoj estas O-vorto, estas stranga rompo de la simpla Esperanta gramatiko.

La *Fundamento* uzas virinajn nomojn kun O-finaĵo. Tion oni rigardu kiel modelon. Sed uzado de A-finaĵoj en virinaj nomoj estas tamen tre disvastiĝinta, kaj pluraj gravaj libroj instruas tion. Tial oni devas tian uzadon almenaŭ toleri, kvankam ĝi estas fremda al Esperanto.

Iuj volas ĉiam uzi la sufikson IN (§38.2.20) en esperantigitaj virinaj nomoj, sed tio normale ne estas necesa. La *Fundamento* enhavas interalie la virinajn nomojn *Mario*, *Klaro*, *Sofio* [FE.38] kaj *Anno* [FE.36], kiuj ne havas sufikson. Sed oni ja povas uzi IN por fari Esperantajn virinajn nomojn. Ekz., se nacilingva nomo ekzistas en du variantoj, unu vira kaj unu ina, oni povas uzi IN en la virina formo, sed oni ankaŭ povas fari tute apartan virinan nomon sen sufikso, aŭ oni povas lasi la nomon en origina formo. Jen kelkaj ekzemploj de virinaj nomoj:

- *Anna* → *Anno* [FE.36], aŭ ne-esperantigite *Anna*.
- *Maria* → *Mario* [FE.38], aŭ *Mariino* (ĉar ekzistas ankaŭ vira nomo *Mario*), aŭ ne-esperantigite *Maria*.
- *Elisabeth* → *Elizabeto* [FE.36], sed multaj diras *Elizabeta*.
- *Myriam* → *Miriamo*, sed prefere ne **Miriama**, ĉar en neniu lingvo tiu nomo havas finan A.
- *Yosiko* → *Joŝiko*. Ne **Joŝika**. Kiam jam la nacilingva formo finiĝas per O, estus vere strange ŝanĝi al A.

## 35.4. Landoj, popoloj kaj lingvoj

Nomoj de landoj kaj landanoj estas normale ĉiam esperantigitaj. Tie ĉi sekvos klarigoj de la bazaj principoj, kiujn ĉiuj nomoj de landoj kaj landanoj sekvas, kaj ankaŭ klarigoj pri nomoj de lingvoj.

Ĉi-poste gentovortoj kaj landanovortoj estas plejparte skribataj kun komenca minusklo: *francoj*, *birmanoj* k.t.p. Ankaŭ skribo majuskla estas ebla, sed multe malpli ofta (§35.5).

La landonomoj en Esperanto apartenas al du kategorioj: **landobazaj** nomoj kaj **gentobazaj** nomoj.

### Landobazaj nomoj

Plej multaj landonomoj estas landobazaj. Tiaj nomoj ne havas sufikson. La baza radiko ordinare estas per si mem nomo de lando. El tia nomo oni kreas vorton por landano per la sufikso AN (§38.2.4):

- *Kanado* (Ameriko) → *kanadanoj* = loĝantoj de Kanado, homoj el Kanado k.s.
- *Burkino* (Afriko) → *burkinanoj* = loĝantoj de Burkino k.s.
- *Peruo* (Ameriko) → *peruanoj*
- *Sudano* (Afriko) → *sudananoj*
- *Alĝerio* (Afriko) → *alĝerianoj*
- *Irano* (Azio) → *irananoj*
- *Pakistano* (Azio) → *pakistananoj*
- *Usono* (Ameriko) → *usonanoj*
- *Aŭstralio* (Oceanio) → *aŭstralianoj*

Iuj landobazaj nomoj estas kunmetaĵoj aŭ plurvortaĵoj. La baza radiko tamen ne nomas genton:

- *Sud-Afriko* (Afriko) → *sud-afrikanoj*
- *Dominika Respubliko* (Ameriko) → *dominik-respublikanoj*
- *Papuo-Nov-Gvineo* (Oceanio) → *papuo-nov-gvineanoj*, *papuanoj*, *nov-gvineanoj*

Se lando havas plurvortan nomon, ofte estas pli oportune uzi la vorton *ano* aŭ la vorton *loĝanto* aŭ ion similan anstataŭ la sufikso AN:

- *Trinidado kaj Tobago* (Ameriko) → *anoj/loĝantoj de Trinidado kaj Tobago*

Iafoje oni povas uzi mallongigon de longa nomo, sed oni ne faru proprajn nekompreneblajn mallongigojn:

- *Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj* (Azio) → *anoj de Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj*, *anoj de UAE*, *UAE-anoj*

Kelkaj landobazaj nomoj finiĝas per *...lando*. Tiam ordinare *land* estas parto de la radiko:

- *Irlando* (Eŭropo) → *irlandanoj* (la radiko estas IRLAND)
- *Nov-Zelando* (Oceanio) → *nov-zelandanoj* (la baza radiko estas ZELAND)

Sed ekzistas ankaŭ landobazaj nomoj, en kiuj LAND estas efektiva Esperanta radiko. La elemento antaŭ LAND tamen ne estas nomo de gento: *Sarlando* (germana federacia lando ĉe la rivero Saro), *Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj* (emiroj ne estas gento, sed speco de regantoj).

## Gentobazaj nomoj

Gentobazaj landonomoj estas faritaj el nomo de popolo (gento). Tiaj landonomoj troviĝas precipe en Eŭropo, sed ankaŭ en Azio kaj Afriko. Oni formas tiajn nomojn el gentonomo per aldono de sufikso. La origina landonoma sufikso estas UJ (§38.2.29):

- *francoj* → *Francujo* (la lando de la francoj, Eŭropo)
- *germanoj* → *Germanujo* (la lando de la germanoj, Eŭropo)
- *japanoj* → *Japanujo* (Azio)
- *somaloj°* → *Somalujo* (Afriko)

Multaj uzas anstataŭ UJ la neoficialan sufikson I (§39.1.12) en gentobazaj landonomoj: *Francio* = *Francujo*, *Germanio* = *Germanujo*, *Japanio* = *Japanujo*, *Somalio* = *Somalujo*, k.t.p.

> **Noto:** Pri la du landonomaj sufiksoj UJ kaj I oni multe diskutis, sed ili estas ambaŭ bone uzeblaj. Ambaŭ estas komprenataj de ĉiuj esperantistoj. Duoblaĵoj kiel ekz. *Francujo* kaj *Francio*, ne estas pli strangaj ol duoblaĵoj kiel *dormejo* kaj *dormoĉambro*, aŭ *policisto* kaj *policano*. Iuj gramatikistoj preferas diri, ke gentobazaj landonomoj kiel *Japanio*, *Germanio* kaj *Rusio* estas faritaj el apartaj radikoj, ne per sufikso. Laŭ tiu teorio ekz. la popolnomo *germanoj* kaj la landonomo *Germanio* estas faritaj el du malsamaj radikoj, GERMAN kaj GERMANI. En la praktiko la teoria analizo tute ne gravas, ĉar la efektivaj vortoj restas la samaj. *Germanujo* kaj *Germanio* ĉiuokaze estas tute samsignifaj, kaj la loĝantoj nomiĝas *germanoj*, *germanujanoj* aŭ *germanianoj*, ĉu oni rigardas la formon *Germanio* kiel kunmetitan, ĉu kiel nekunmetitan.

Oni ankaŭ povas uzi la radikon LAND sufiksece anstataŭ UJ aŭ I en gentobazaj nomoj. Oni uzu LAND prefere nur kiam tio donas tre internacian nomformon aŭ kiam tia nomformo estas tradicia en Esperanto:

- *finnoj → Finnlando* (la lando de la finnoj, Eŭropo)
- *svazioj° → Svazilando* (Afriko)
- *poloj → Pollando* (Eŭropo)

Ankaŭ ĉe gentobazaj landonomoj oni povas uzi AN por fari nomon de landano, kvankam tio estas malofta:

- *Rusujo → rusujanoj* (= anoj de Rusujo)
- *Japanujo → japanujanoj* (= anoj de Japanujo)
- *Somalujo → somalujanoj* (= anoj de Somalujo)
- *Finnlando → finnlandanoj* (= anoj de Finnlando)

Rimarku, ke oni ne aldonu AN al popolvorto. Ne diru **francanoj**. Tio signifus *anoj de franco* (= ano de homo). Oni aldonu AN al landonomo: *Francujo* (aŭ *Francio*) → *francujanoj* (aŭ *francianoj*). Aŭ oni diru simple *francoj*.

Teorie estas diferenco inter ekz. *germanujano* kaj *germano*. *Germanujano* estas ano de la lando Germanujo, dum *germano* estas ano de la germana gento. Sed ordinare oni ignoras tiun teorian diferencon. Nur kiam oni parolas aparte pri diversaj gentoj, oni bezonas fari tiajn distingojn, ekz.: *Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas Rusujanoj, kvankam ili ne estas rusoj.* [FE.37]

Ĉe kelkaj tre specialaj landonomoj oni ne povas uzi la simplan popolvorton por nomi anojn de tiu lando. Loĝantojn de ekz. *Interna Mongolujo* (parto de Ĉinujo) oni ne povas simple nomi *mongoloj*, ĉar tio kompreniĝas kiel anoj de Mongolujo (alia lando). Loĝantojn de *Nova Sud-Kimrujo* (parto de Aŭstralio) oni ne povas nomi *kimroj*, ĉar tio estus anoj de *Kimrujo* (parto de Britujo). Loĝantojn de *Saksujo-Anhalto* (parto de Germanujo) oni ne povas simple nomi *saksoj*, ĉar saksoj troviĝas ankaŭ en *Saksujo* (alia parto de Germanujo). En tiaj specialaj okazoj oni devas uzi esprimojn kiel *anoj de Interna Mongolujo*, *intern-mongolujanoj*, *anoj de Nova Sud-Kimrujo*, *nov-sud-kimrujanoj*, *anoj de Saksujo-Anhalto*, *saksujo-anhaltanoj* k.t.p.

Kelkaj popolnomoj estas komuna nomo por pluraj gentoj. Ekz. *belgoj* ne estas gento en si mem, sed komuna nomo de *flandroj* kaj *valonoj*, la du ĉefaj gentoj de Belgujo. *Britoj* estas komuna nomo de *angloj*, *kimroj* kaj *skotoj*, la tri ĉefaj gentoj de Britujo. *Baltoj* estas komuna nomo de la tri gentoj *estonoj*, *latvoj* kaj *litovoj* en la landoj *Estonujo*, *Latvujo* kaj *Litovujo*, kiuj kune formas la regionon *Baltujo*. *Etiopoj* estas komuna vorto por ĉiuj ĉirkaŭ 80 diversaj gentoj en Etiopujo (*oromoj*°, *amharoj*°, *tigrajoj*° k.a.). Homo povas do esti samtempe belgo kaj flandro, samtempe brito kaj skoto, samtempe balto kaj estono k.t.p.

> **Noto:** La radiko BALT estas en Esperanto nomo de homo, ne de maro. La regiono do nomiĝas *Baltujo*, *Baltio* aŭ *la Baltaj ŝtatoj/landoj*, ne **Ĉebaltio** aŭ simile. La apuda maro nomiĝas *la Balta Maro* [FA1.200].

## Kiel scii, ĉu nomo estas landobaza aŭ gentobaza?

Se oni renkontas landonomon, kiu finiĝas per *...ujo*, oni ĉiam scias certe, ke ĝi estas gentobaza, kaj ke ekzistas simpla gentovorto por la koncerna popolo.

Se oni aŭdas landonomon, kiu finiĝas per *...io*, oni ne povas esti certa, ĉar multaj landobazaj nomoj (hazarde) finiĝas tiel, kvankam ili ne havas Esperantan sufikson, ekz. *Aŭstralio*, *Namibio* kaj *Ĉilio*. En tiuj landoj ne loĝas **aŭstraloj**, **namiboj** aŭ **ĉiloj**. Tio signifas ankaŭ, ke oni ne povas uzi la sufikson UJ en tiaj nomoj, ĉar la nomoj ne estas gentobazaj. La vokalo *i* estas parto de la radiko en tiuj kaj en multaj aliaj landonomoj.

Ankaŭ kiam oni renkontas landonomon, kiu finiĝas per *...lando*, oni ne povas esti certa. Iuj tiaj nomoj estas landobazaj, ekz. *Nederlando* kaj *Islando*, dum aliaj estas gentobazaj, ekz. *Pollando* kaj *Svislando*. La popolon de Pollando oni povas nomi *poloj*, sed la loĝantoj de Nederlando ne estas **nederoj**.

Se oni scias certe, ke landonomo estas farita el nomo de gento, oni povas uzi la simplan popolnomon. Sed se oni ne scias, aŭ se oni hezitas, oni povas ĉiam uzi kunmetaĵon kun la sufikso AN: *francianoj*, *ĉinianoj*, *pollandanoj* k.t.p. Tia uzado neniam povas esti erara.

### *"Istanoj"*

Pluraj landonomoj finiĝas per *...istano* (§39.1.19): *Pakistano*, *Afganistano*, *Uzbekistano* k.a. En iaj okazoj por tia lando ekzistas gentovorto similforma: *afganoj*, *uzbekoj* k.a. En tiaj okazoj estas pli bone uzi gentobazajn nomojn por la landoj: *Afganujo* (aŭ *Afganio*), *Uzbekujo* (aŭ *Uzbekio*) k.t.p. Sed ne ĉiuj "istan"-landoj havas tian respondan gentovorton. En ekz. *Pakistano* ne loĝas **pakoj**, sed *pakistananoj* (kaj sekve oni ne povas la landon nomi **Pakujo** aŭ **Pakio**).

### Arbitra divido

Plej multaj landonomoj estas landobazaj, sed kelkaj, precipe en Eŭropo kaj Azio, estas gentobazaj. La kategoria divido, kiu esence estas arbitra, diras absolute nenion pri la landoj aŭ pri la popoloj de tiuj landoj. Ĉu ekzistas aŭ ne ekzistas aparta vorto por grupo de homoj, neniel montras, ĉu tiuj homoj estas unueca gento aŭ ne. En multaj landoj kun landobazaj nomoj loĝas pli-malpli unuecaj gentoj, ekz. *Irano*, *Kamboĝo*, *Nederlando*, *Islando* k.a. Tia dukategorieco estas tute normala en Esperanto. Oni komparu kun ekz. instrumentoj: *broso*, *aŭto*, *gitaro* (sensufiksaj), *kombilo*, *aviadilo*, *tajpilo* (sufiksaj). Tio estas same arbitra kiel la divido de landonomoj. Same estas pri istoj, uloj kaj multaj aliaj grupoj de vortoj.

Zamenhof kaj aliaj parolis pri distingo inter malnova mondo (Eŭropo, Azio kaj partoj de Afriko), kie ĉiu lando apartenas al unu ĉefa gento, kaj kie oni uzu (precipe) gentobazajn nomojn, kaj nova mondo, kie ĉiuj gentoj estas egalaj, kaj kie oni uzu landobazajn nomojn. Tio estis nura teorio, kiu neniam vere realiĝis en la lingvo. Estas prave, ke gentobazaj nomoj troviĝas precipe

en la tiel nomata malnova mondo, sed ekzistas tiom da esceptoj, ke la teorio estas praktike neuzebla.

## Diverseca uzo

La praktika uzo de landonomoj kaj popolnomoj estas sufiĉe varia. Tio kaŭzas iom da ĝeno kaj problemoj, sed ĉiuj diversaj variantoj estas tamen uzeblaj laŭ la ĉi-antaŭaj principoj. Se ekz. oni preferas la landobazan nomon *Koreo* (nuntempe tre maloftan), oni nomu la landanojn *koreanoj*. Se oni preferas la gentobazan kaj hodiaŭ plej oftan formon *Koreujo/Koreio* por la sama lando, oni nomu la loĝantojn *koreoj* aŭ eventuale *koreujanoj/koreianoj*. Sed oni nepre ne miksu. Oni ne parolu pri **koreanoj en Koreujo**. La du sistemoj estas egale logikaj. Ĉu oni preferas paroli pri *koreanoj*, ĉu oni volas nomi ilin *koreoj*, oni parolas pri la sama popolo. En ĝuste tiu ĉi okazo la gentobazaj formoj estas tamen superregaj, kaj ankaŭ rekomendataj de la Akademio de Esperanto.

Pri kelkaj popolvortoj oni havas malsamajn opiniojn, ĉu ili estu uzataj aŭ ne. Multaj ekz. uzas la popolvorton *aŭstroj* kaj la gentobazan landonomon *Aŭstrujo/Aŭstrio*, dum aliaj parolas ĉiam nur pri *aŭstrianoj* (kun la landobaza nomo *Aŭstrio*). Iuj uzas la vorton *jugoslavoj* kiel komunan nomon por la diversaj gentoj de la iama Jugoslavujo, dum aliaj volas paroli nur pri *jugoslavianoj* en *Jugoslavio*. Normale ne multe gravas, kiun uzon oni sekvas. Oni nur ne elpensu novajn variantojn senbezone.

Jam en la unuaj jaroj de la historio de Esperanto ekzistis tiaj hezitoj pri la kategorio de iuj landonomoj. En tre fruaj tekstoj oni povas trovi nomojn kiel **Alĝerujo** (gentobaza formo anstataŭ la nuna landobaza nomo *Alĝerio*) kaj **Kanadujo** (nun ĉiam *Kanado*). Sed jam dekomence ekzistas landonomoj de ambaŭ kategorioj, kaj ĝenerale la uzado de landonomoj kaj vortoj por landanoj sekvas la samajn principojn hodiaŭ kiel en la unuaj jaroj.

**Noto:** Ie kaj tie oni povas legi asertojn, ke en la unua tempo ĉiuj landonomoj estis gentobazaj. Tiuj asertoj tamen estas malpravaj. Jam en la unua Esperanta periodaĵo *La Esperantisto* (1889-1895) kaj ĝenerale en la skribaĵoj publikaj kaj privataj de Zamenhof en la plej fruaj jaroj, oni trovas ambaŭ kategoriojn de landonomoj.

## A-finaĵo

A-vorto farita el landobaza landonomo signifas “rilata al la lando, tia kiel (en) la lando, rilata al la homoj en la lando” k.t.p.:

- *Usono* → *usona* = rilata al Usono aŭ usonanoj, tia kiel (en) Usono, tia kiel usonanoj, k.s.
- *Peruo* → *perua* = rilata al Peruo aŭ peruanoj, tia kiel (en) Peruo, tia kiel peruanoj, k.s.

Oni ankaŭ povas fari A-vortojn el popolnomoj kun AN-sufikso. Tia A-vorto signifas nur “rilata al la popolo, tia kiel la popolo”, sed tiaj A-vortoj estas tre maloftaj: *usonano* → *usonana* (malofta vorto) = “rilata al usonanoj, tia kiel usonanoj”, *peruano* → *peruana* (malofta vorto) = “rilata al peruanoj, tia kiel peruanoj”.

Ĉe gentobazaj landonomoj oni kutimas uzi A-vorton sen sufikso, do A-vorton faritan el la gentonomo: *franca*, *japana*, *etiopa* k.t.p. Tiaj vortoj devus teorie signifi nur "rilata al la popolo, tia kiel la popolo". Sed en la praktiko oni uzas ilin ankaŭ por la senco "rilata al la lando":

- *franco* → *franca* = rilata al francoj aŭ al Francujo
- *japano* → *japana* = rilata al japanoj aŭ al Japanujo
- *finno* → *finna* = rilata al finnoj aŭ al Finnlando

Kompreneble oni ankaŭ povas uzi A-vortojn faritajn el plena gentobaza landonomo, sed tio estas pli malofta:

- *Francujo* → *francuja* (malofta vorto) = rilata al Francujo
- *Japanujo* → *japanuja* (malofta vorto) = rilata al Japanujo
- *Finnlando* → *finnlanda* (malofta vorto) = rilata al Finnlando

Se oni celas la sencon "rilata al la lando", kaj se estas tre grave, ke neniu mise komprenu "rilata al la gento/landanoj", tiam oni ja uzu tiajn vortojn kiel *francuja*. Sed en la praktiko plej ofte tute bone taŭgas kaj funkcias la pli kutima formo *franca*, ankaŭ kiam vere temas pri "rilata al Francujo".

En iuj landoj, ekz. Rusujo, oni ĝenerale emas tre zorge distingi gentecon. En tiaj okazoj A-vortoj kiel *rusuja* estas pli oftaj (ĉar oni opinias, ke *rusa* signifu nur "rilata al rusoj"). En tiaj okazoj oni ankaŭ pli ofte rezervas gentovortojn, ekz. *rusoj*, por la efektiva gento, preferante kunmetaĵojn kiel *rusujanoj*, kiam oni parolas pri ĉiuj anoj de la lando (ankaŭ tiuj, kiuj ne estas rusoj en genta senco).

### Gentoj sen gentonomo

En multaj landoj, kiuj havas landobazan nomon, tamen ekzistas efektiva gento kun propra lingvo k.t.p., ekz. *Nederlando*, *Islando*, *Birmo* k.a. Se oni volas paroli pri tiuj gentoj, oni devas uzi kunmetaĵon kun AN-sufikso: *nederlandanoj*, *islandanoj*, *birmanoj* k.t.p. Tiaj AN-vortoj do estas plursignifaj. Ili povas esprimi puran landanecon aŭ civitanecon, sed ili ankaŭ povas esti uzataj kun genta signifo. Tio signifas, ke nekunmetitaj popolnomoj kiel *francoj* kaj *japanoj* tute similas al AN-sufiksaj popolnomoj kiel *nederlandanoj* kaj *birmanoj*. En ambaŭ okazoj la vortoj estas plursignifaj. AN-vorto kiel *irlandanoj* baze havas la signifon de landanovorto, sed ĝi povas uziĝi laŭbezone ankaŭ kiel gentovorto, dum gentovortoj kiel *svedoj* kaj *koreoj* baze estas gentaj vortoj, sed uziĝas tre ofte ankaŭ por landana kaj eĉ civitana senco. La diferenco estas do ĉefe gramatika. Tio, ke en iaj okazoj ekzistas simpla gentovorto, dum aliokaze ne, estas esence hazardo. Oni ne provu kompreni tion kiel iaspecan indikon pri genta pureco aŭ simile.

## Lingvonomoj

El landobazaj landonomoj kaj el simplaj popolnomoj oni povas fari nomojn de lingvoj. Oni faras A-vorton kaj aldonas la vorton *lingvo*. Oni preskaŭ ĉiam uzas *la* kun tiaj lingvonomoj (§9.1.5). Tre ofte oni ellasas (subkomprenas) la vorton *lingvo*:

- *anglo → la angla (lingvo)* = la lingvo de la angla popolo (kaj de multaj aliaj)
- *ĉino → la ĉina (lingvo)* = la lingvo de la ĉina popolo
- *arabo → la araba (lingvo)* = la lingvo de la araboj
- *zuluo → la zulua (lingvo)* = la lingvo de la zuluoj
- *Nederlando → la nederlanda (lingvo)* = la lingvo de Nederlando
- *Birmo → la birma (lingvo)* = la lingvo de Birmo
- *Indonezio → la indonezia (lingvo)* = la lingvo de Indonezio
- ***La franca lingvo** videble estis tiu el ŝiaj scioj, de kiu ŝi esperis plej multe.* [M.24]
- *Tia lingvo konkurados en la mondo antaŭ ĉio kun **la lingvo angla**, kiu celas fariĝi internacia.* [OV.374]
- *Mi ne scias **la lingvon hispanan**.* [FE.34]
- *Ĉu vi parolas **la anglan (lingvon)**?*
- *Mi volas lerni **la ĉinan (lingvon)**.*
- *Ŝi parolas **la japanan (lingvon), la korean (lingvon)** kaj **la vjetnaman (lingvon)**.*
- *Ŝi parolas **la japanan, korean** kaj **vjetnaman (lingvojn)**.*

El tiaj lingvonomoj oni povas fari diversajn kunmetitajn vortojn, plej ofte subkomprenante la elementon *lingvo*, ekz.: *angligi* = "traduki en la anglan lingvon", *elarabigi* = "traduki el la araba lingvo", *hispanparolanto* = "parolanto de la hispana lingvo", *japanlingva* = "en la japana lingvo, scianta la japanan lingvon, k.s.".

Oni atentu, ke por multaj popoloj kaj lingvoj ne ekzistas responda landonomo, ekz. *la hebrea lingvo* = "la lingvo de la hebreoj (judoj)", kiu estas parolata ĉefe en Israelo; *la persa*, kiun parolas la persoj, la plej granda gento en Irano (antaŭe oni nomis la landon *Persujo*, sed nun ĝi estas *Irano*); *la malagasa* nomata laŭ la malagasoj en Madagaskaro (antaŭe nomata *Malagasujo*); kaj *la svahila*, kiu estas parolata en pluraj afrikaj landoj.

Ekzistas ankaŭ lingvoj, kiuj havas tute propran nomon kun O-finaĵo, ekz.: *Esperanto*, *Ido*, *Volapuko*, *Lingvafrankao*°, *Fanagalo*°, *Papiamento*, *Tokpisino*°, *Sanskrito*, *Latino*, *Urduo*. Antaŭ tiaj lingvonomoj oni ne uzu *la* (§9.1.5):

- *Oni parolas **Esperanton**.* [OV.401]
- *En la lernejo mi studis **Latinon**, sed ne la grekan.*
- ***Urduo** estas tre simila al la hinda lingvo.*

Principe oni skribu ĉiujn tiajn O-finaĵajn lingvonomojn kun komenca majusklo, ĉar ili tute kondutas kiel propraj nomoj, sed se ne temas pri planlingvoj kiel *Esperanto* kaj *Volapuko*, nek pri programada lingvo kiel *Baziko* kaj *Kobolo*, oni tamen ofte uzas minusklan skribon: *latino*, *sanskrito*, *urduo*. En la Deka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro (§46) la Akademio de Esperanto tamen oficialigis la nomojn *Latino* kaj *Sanskrito* kun majuskla komenclitero.

O-vortajn lingvonomojn oni principe ankaŭ povas uzi en A-vorta formo. Tiam oni ja uzu artikolon: *la Esperanta (lingvo)*, *la sanskrita (lingvo)*, *la urdua (lingvo)*, *la Ida (lingvo)*. Sed normale oni uzu la simplan O-formon sen *la*. Se oni vidas tian esprimon kiel ekz. *la urdua (lingvo)*, oni spontane supozas, ke ekzistas aŭ popolo **urduoj** aŭ lando **Urduo**, sed tia popolo aŭ lando tute ne ekzistas, kaj tial estas misgvide paroli pri *la urdua*. Pli klara estas la normala formo *Urduo*. En iaj okazoj tamen tia A-finaĵa formo estas la sola uzata praktike, ekz. *la hindia*, *la jida* kaj *la palia*, kvankam tiuj nomoj tute ne estas faritaj el nomo de lando aŭ popolo (aŭ de io ajn alia).

Ĉiuj planlingvoj havas propran nomon, sed ial oni malemas esperantigi tiajn nomojn. Oni preferas paroli per fremdaj nomoj pri *Volapük*, *Solresol*, *Idiom Neutral*, *Latino sine flexione*, *Novial*, *Occidental*, *Interlingue*, *Interlingua*, *Basic English*, *Interglossa*, *Loglan*, *Bliss* k.t.p. Nur *Esperanto*, *Volapuko* kaj *Ido* estas ofte uzataj Esperantaj nomoj de planlingvoj. Kial ne esperantigi, kiom eble, ĉiujn tiajn nomojn? Oni ja esperantigas la nomojn de pli-malpli ĉiuj aliaj lingvoj en la mondo. La jenaj esperantigitaj nomoj povas do esti uzindaj: *Solresolo°*, *Idiomo Neŭtrala*, *Latino sen fleksio*, *Novialo°*, *Okcidentalo°*, *Interlingveo°*, *Interlingvao°*, *Baza Angla*, *Intergloso°*, *Loglano°*, *Loĵbano°*, *Bliso°*, *Tokipono°* k.t.p.

## 35.5. Majuskloj kaj minuskloj ĉe propraj nomoj

Pri majuskloj kaj minuskloj (§1.1) ne ekzistas devigaj reguloj en Esperanto. Majusklado povas helpi al klareco, sed estas cetere sufiĉe malgrava afero.

Ekzistas diversaj sistemoj kaj konvencioj pri uzado de majuskloj ĉe propraj nomoj kaj vortoj kreitaj el propraj nomoj. Gazetoj ofte havas propran regularon, kaj unuopuloj havas proprajn kutimojn. Ĝenerale ekzistas du tendencoj, **minusklema skribo** (oni uzas majusklojn nur ĉe efektivaj propraj nomoj) kaj **majusklema skribo** (oni uzas majusklojn ankaŭ en vortoj, kiuj estas similaj al propraj nomoj, kaj en vortoj faritaj el propraj nomoj). Minusklema skribo estas klare pli ofta, sed kelkaj malmultaj uzas majusklemán skribon. Sed ofte en minusklema skribo oni faras kelkajn esceptojn en apartaj okazoj, kiuj estos klarigitaj ĉi-poste.

> **Noto:** Antaŭe PMEG uzis plejparte tre majuskleman skribon, sed nun en PMEG aperas precipe minusklema skribo, krom en ekzemploj, en kiuj la skribo de la origina teksto estas konservita.

Oni skribas ĉiujn proprajn nomojn kun komenca majusklo: *Elizabeto*, *Parizo*, *Ĉinujo*, *Nov-Zelando*, *Esperanto*. Tio estas ĝenerala regulo, kiun sekvas pli-malpli ĉiuj.

Se nomo konsistas el pluraj vortoj, oni plej ofte krom la unua vorto majuskligas ankaŭ ĉiun gravan vorton de la nomo (precipe O-vortojn kaj A-vortojn):

*Nigra Maro*, *Sankta Petro*, *Dominika Respubliko*. Sed malgravajn partojn de tiaj nomoj (precipe vortetojn) oni ofte skribas minuskle (krom se temas pri la unua vorto de la nomo): *Departemento pri Eksterlandaj Aferoj*, *Bulonjo ĉe Maro*. Iafoje komenca *la* estas efektiva parto de la nomo: *La Nobla Korano*, *La Kancerkliniko* (nomo de gazeto). Legu cetere pri *la* ĉe propraj nomoj en §9.1.6.

Se oni faras el propra nomo alian vorton, kiu mem ne estas propra nomo, plej multaj uzas minusklan skribon, ĉar la nova vorto mem ne estas propra nomo.

- *Eŭropo* → *eŭropa*: *la plej gravaj* ***eŭropaj*** *lingvoj* [AD.10]
- *Ameriko* → *amerika*: *la teron* ***amerikan*** [OV.400]
- *Esperanto* → *esperantisto*: *la unua kongreso de la* ***esperantistoj*** [OV.363]
- *Voltero* (nomo de filozofo) → *volterano*: *La* ***volteranoj*** *vane kontraŭ tio ĉi parolas.* [Rz.8]
- *En la* ***februara*** *numero ni legis raporton pri nia lando, kaj certe ni ĝojas, ĉar de ĉiam la* ***brazilaj*** *kaj* ***argentinaj esperantistoj*** *kunagadis por la komuna celo.* *Februaro* estas propra nomo de monato. *Brazilo* kaj *Argentino* estas landonomoj. *Esperanto* estas lingvonomo. Legu pli ĉiposte pri tiaj nomoj.

Sed iuj tamen uzas komencan majusklon en tiaj vortoj, ĉar la propranoma parto de la vorto restas propra nomo: *Eŭropa*, *Amerika*, *Volterano* kaj iafoje eĉ *Esperantisto*. Tia skribo estas nuntempe malofta, sed ĉe Zamenhof oni povas trovi multajn ekzemplojn de tia skribmaniero:

- *La* ***Volapükistoj*** *havis por sia agitado grandajn rimedojn kaj agadis per la plej vasta, pure* ***Amerika*** *reklamo, kaj la* ***Esperantistoj*** *agadis la tutan tempon preskaŭ tute sen iaj materialaj rimedoj.* [FK.284] *Ameriko* estas propra nomo de kontinento. *Volapük* kaj *Esperanto* estas propraj nomoj de lingvoj. Minuskla skribo de la vorto *esperantisto* estas tamen multe pli ofta, precipe nuntempe.
- *La* ***Bremena*** *vaporŝipo "Lloyd" staras en la haveno.* [FK.202] *Bremeno* estas germana urbo.
- *Germanoj kaj francoj, kiuj loĝas en Rusujo, estas* ***Rusujanoj***. [FE.37]
- *Tiaj formoj* [...] *estas nek* ***kontraŭ-Esperantaj***, *nek novaj.* [LR.52A] Oni normale ne skribas **kontraŭEsperantaj**, kiam oni uzas majusklan E, sed uzas dividostrekon, ĉar estas iom strange skribi majusklon tuj post minusklo. Se oni preferas minusklan skribon, oni povas skribi *kontraŭesperantaj* aŭ *kontraŭ-esperantaj* laŭplaĉe.

En iaj okazoj eĉ tre minusklemaj gazetoj tamen uzas majusklan skribon de tiaj vortoj. Tre oftaj estas la skriboj *Esperanta* kaj *Esperante* (rilata/rilate al la lingvo Esperanto) por eviti konfuzon kun la participoj *esperanta* kaj *esperante* (el la verbo *esperi*), kvankam tiuj participaj formoj aperas nur tre malofte en la praktiko. Aliaj oftaj majusklaj skriboj estas *Fundamenta* (rilata al la verko *Fundamento de Esperanto*) kaj *Zamenhofa* (rilata al Zamenhof) kaj *Akademia* (rilata al la Akademio de Esperanto). Entute A-vortoj faritaj el

nomoj de personoj estas relative ofte skribataj majuskle por klareco: *Ŝekspira*, *Hitlera*, *Konfucea* k.s. Tio estas aparte ofta, kiam la propra nomo ne estas esperantigita (§35.2): *Einstein-a*, *Keynes-a* k.s.

### Monatoj

Monatonomoj (*Januaro*, *Februaro*, *Marto*, *Muharamo*°, *Ramadano* k.a.) estas normalaj propraj nomoj. Tradicie, Fundamente kaj zamenhofe ili estas do skribataj kun komenca majusklo. Tio estas rekomendinda:

- ***Januaro** estas la unua monato de la jaro, **Aprilo** estas la kvara, **Novembro** estas la dek-unua, **Decembro** estas la dek-dua.* [FE.12]

Nuntempe tamen multaj skribas monatonomojn minuskle, kvankam oni ankoraŭ ĉiam traktas ilin kiel proprajn nomojn (ĉiam sen *la*, §9.1.6). Kvankam tia minuskla skribo estas tre ofta, ĝi ne estas rekomendinda.

### Festoj

Nomoj de festoj estas normalaj propraj nomoj kun komenca majusklo: *Kristnasko*, *Pasko*, *Advento*, *Aŝuro*° k.t.p. Sufiĉe ofte oni tamen uzas *la* antaŭ tiaj nomoj, kaj iafoje oni eĉ vidas ilin kun komenca minusklo (kun aŭ sen *la*), sed tio ne estas imitinda:

- *Ho, se estus jam **Kristnasko**!* [FA2.44] En la *Universala Vortaro* de la *Fundamento* la vorto *kristnasko* estas tamen minuskle skribita. Sed normale ĝi estas uzata propranome sen *la*.
- *Ĝi estas ofero de **Pasko** al la Eternulo.* [Er.12]

### Semajntagoj

La nomoj de la semajntagoj (*lundo*, *mardo*, *merkredo* k.t.p.) ne estas propraj nomoj, kaj estas tial skribataj minuskle. Ili estas tamen ofte uzataj propranomece (§9.1.6).

### Landoj, popoloj kaj lingvoj

Landonomojn oni ĉiam skribas kun komenca majusklo, ĉar ili estas veraj propraj nomoj: *Nederlando*, *Usono*, *Koreujo*, *Azerbajĝano* k.t.p.

Popolnomojn faritajn el landonomo oni plej ofte skribas minuskle: *nederlandanoj*, *usonanoj* k.t.p. Sed ankaŭ majuskla skribo estas ebla: *Nederlandanoj*, *Usonanoj* k.t.p. Simplaj popolnomoj ne estas propraj nomoj, kaj oni ordinare skribas ilin minuskle: *norvegoj*, *araboj* k.t.p. Sed ili estas tamen tre similaj al propraj nomoj, kaj iuj uzas komencan majusklon, kio eble povas helpi al klareco: *Norvegoj*, *Araboj* k.t.p.

Lingvonomojn faritajn el popolnomo aŭ landonomo (§35.4) oni ordinare skribas minuskle: *la nederlanda*, *la islanda*, *la hinda*, *la araba*, *paroli ĉine* k.s. Sed ĉar ili devenas de vortoj, kiujn oni povas skribi majuskle, oni povas uzi majusklan skribon ankaŭ de tiaj lingvonomoj: *la Nederlanda*, *la Islanda*, *la Hinda*, *la Araba*, *paroli Ĉine* k.t.p.

Verajn lingvonomojn kun O-finaĵo (§35.4) oni principe skribu majuskle, ĉar ili ĉiam kondutas kiel propraj nomoj: *Esperanto*, *Ido*, *Lispo*, *Latino*, *Sanskrito*, *Urduo* k.a.

## Majuskloj en la *Fundamento*

Iafoje oni legas asertojn, ke tia aŭ alia uzo de majuskloj ĉe popolnomoj k.s. estas "kontraŭ-Fundamenta". La uzo en la *Fundamento* estas tamen varia, kaj troviĝas en ĝi ekzemploj de diversspecaj uzoj de majuskloj kaj minuskloj ĉe tiaj ĉi vortoj. La *Fundamento* simple ne instruas ion definitivan pri majuskloj ĉe tiaj ĉi vortoj.

## 36. Citaĵoj

Kiam vortoj estas citataj, ili povas roli tiel, kiel ili laŭ finaĵoj kaj ordinaraj reguloj normale ne povus roli. Citataj vortoj ofte ne estas uzataj en normala maniero por reprezenti ian signifon. Ili reprezentas nur sin mem. Ĉiaj ajn vortoj, vortetoj, frazoj, frazpartoj aŭ aliaj esprimoj povas aperi kiel citaĵo. Eĉ alilingvaj esprimoj povas tiel aperi.

Citaĵoj ĉiam rolas O-vortece. Ili povas havi tiajn priskribojn, kiajn povas havi O-vorto. Ili povas havi la artikolon *la* aŭ alian difinilon. Ili povas havi rolvorteton, sed ne N-finaĵon (krom se la N-finaĵo mem estas parto de la citaĵo).

Citaĵoj ofte aperas inter citiloj aŭ alimaniere apartigite de la ordinaraj vortoj (ekz. per specialaj litertipoj), sed iafoje oni ne uzas tian apartigan rimedon.

Ofte oni uzas anoncesprimon (*la vorto*, *la ideo*, *la nomo*) antaŭ citaĵo. Se aperas anoncesprimo, ĝi transprenas ĉiujn eventualajn priskribojn, difinilojn kaj rolmontrilojn. La citaĵo mem tiam estas identiga priskribo de la anoncesprimo. Oni povus eĉ diri, ke citaĵo ĉiam rilatas al anoncesprimo, kiu tamen povas esti subkomprenata:

- ***La “tuj”** de sinjoroj estas multe da horoj.* PE.879 = *La **ideo** “tuj” signifas por sinjoroj multe da horoj.*
- *Inter **voli** kaj **fari** estas grandega, grandega paŝo.* OV.422 = *Inter **la ago** voli kaj **la ago** fari ...*
- *Legu la klarigon sub **fari**.* = ... *sub **la vorto** fari* [en vortaro].
- *Kontraŭ la uzado de **“li”** en tiaj okazoj oni nenion povus havi.* LR.90 Ne temas pri iu viro, sed pri la vorto *li*.
- *Anstataŭ **“la”** oni povas ankaŭ diri **“l’”**.* FE.27 = *Anstataŭ la **vorto** “la” oni povas ankaŭ diri la **vorton** “l’”*. La vorto *“l’”* rolas kiel objekto.
- *Anstataŭ **“ci”** oni uzas ordinare **“vi”**.* FE.16 = *Anstataŭ la **vorto** “ci”*... La citaĵo *“vi”* rolas kiel objekto sed sen N-finaĵo.
- *Estu kiel vi volas, se mi nur kunprenos kun mi mian **“mi”**.* Rt.114 La citaĵa objekto *“mi”* ne havas N-finaĵon.
- ***“Tabloj”** estas O-vorto.* La vorto *O-vorto* restas unu-nombra, ĉar *tabloj* estas nur unu vorto. Ĝia J-finaĵo estas nur parto de la citaĵo.
- ***“Bonan tagon!”** sonis subite tra la pordo.* Citata salutfrazo rolas kiel subjekto. La N-finaĵoj devas resti sendepende de la frazrolo.
- *Pli bona estas malgranda **“jen prenu”** ol granda **“morgaŭ venu”**.* PE.1202
- *La franco diras pri infano “**il**”, la germano diras “**es**”.* LR.90 Fremdlingvaj vortoj aperas kiel objektoj, sed ne havas N-finaĵon. Oni povus enŝovi anoncesprimon, kiu tiam havus N-finaĵon: ... *diras pri infano **la vorton** “*il*”...*
- *Mi ne scias, sinjorino, kiel oni skribas **bateau**. E-a-u aŭ a-u?* M.50 Franca vorto rolas kiel objekto, sed ne havas N-finaĵon.

- *“**Prenez garde aux enfants!**” diris la strigo-patro.* [FA3.37] Franca frazo rolas kiel objekto.
- *Ni devas diri kelke da vortoj pri **“Posrednik”**.* [OV.201] Rusa nomo de gazeto rolas kiel *pri*-komplemento.

### *Signifi*

La objekto de la verbo *signifi* estas ofte citaĵo, kiu montras la signifon. Tiam oni normale ne uzu N-finaĵon:

- *La angla vorto “house” signifas **“domo”**.* = *... signifas **la ideon** “domo”.* Se oni dirus *... signifas “domon”*, oni povus kompreni, ke la angla vorto iel enhavus en si ankaŭ la signifon de la N-finaĵo.
- *La vorto “estonto” povas signifi nur **“estonta persono”**, sed ĝi ne povas signifi **“estonta tempo”** aŭ **“estonta afero”**.* [LR.114A]

Oni ankaŭ povas uzi N-finaĵon, se konfuzo ne povus estiĝi, sed tio estas nuntempe tre malofta: *Metro de drapo signifus **metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo**.* [FE.32]

Se la objekto de *signifi* ne mem montras la signifon, sed nur reprezentas ĝin, tiam oni nepre uzu N-finaĵon: *Tiu vorto signifas **ion**, sed mi ne scias, **kion** ĝi signifas. **Kion** signifas “house”? “House” signifas “domo”!* La vortetoj *io* kaj *kio* ne estas mem la signifoj de la priparolitaj vortoj. Ili neniel estas citaĵoj. Sed en la jena frazo *kio* ja estas citaĵo: *La angla vorto “what” signifas **“kio”**.*

### Rekta parolo

Citaĵo povas esti frazo, kiun iu diris, pensis aŭ simile. Tian citaĵon oni nomas rekta parolo:

- *La kato diris: **“Ĉu vi povoscias ĝibiĝi, ĉu vi povoscias ŝpini, ĉu vi povoscias aperigi fajrerojn?”*** [FA2.39]
- ***“Lasu ĝin trankvila!”** diris la patrino, **“ĝi ja al neniu ion faras!”*** [FA2.36]

Rektan parolon oni povas ofte transformi en subfrazon. Tion oni nomas nerekta parolo (§33.8): *La kato demandis, **ĉu ĝi povoscias ĝibiĝi**. La patrino diris, **ke ili lasu ĝin trankvila**.*

### Titoloj de libroj k.s.

Titoloj de libroj, gazetoj k.s. povas esti traktataj kiel citaĵoj. Se la titolo estas alilingva, tio estas eĉ nepra. Iaj Esperant-lingvaj titoloj povas esti uzataj kiel ordinaraj vortoj, aliaj devas esti traktataj kiel citaĵoj. Precizaj reguloj ne ekzistas:

- *Ĉu vi legis (la libron) **Pan Tadeusz**?* La pollingva nomo ne povas akcepti N-finaĵon. Oni povas enmeti la anoncvorton *libro*, kiu tiam ricevas la finaĵon.
- *Ĉu vi legis la **Parnasan Gvidlibron**?* La Esperant-lingva titolo facile akceptas N-finaĵon. Uzi ĝin kiel citaĵon sen N-finaĵo estus strange.
- *Ĉu vi legis **Sinjoron Tadeo**? Ĉu vi legis (la libron) **Sinjoro Tadeo**?* La Esperant-lingva titolo povas akcepti N-finaĵon, sed tio povas ŝajni

stranga. Oni ja ne legis sinjoron, sed libron. Oni povas alternative uzi la titolon kiel citaĵon, eventuale kun anoncesprimo.

- *Ĉu vi legis **"Ĉu vi kuiras ĉine?"**?* Tiu ĉi Esperant-lingva titolo devas esti traktata kiel citaĵo, ĉar ĝi estas tuta frazo.
- *Nun la ludiloj komencis ludi, jen **"Ni ricevas gastojn"**, jen **"Rabistoj kaj urbaj soldatoj"**, jen **"Kaŝiĝo"**.* [FA1.154] Nomoj de infanludoj aperas kiel objektoj, sed sen N-finaĵo, ĉar ili estas citaĵoj.

# Vortfarado

## 37. Vortfaraj principoj

La reguloj kaj principoj de vortfarado estas ĉi tie klarigitaj en maniero speciala por *PMEG*. Aliaj lernolibroj uzas aliajn manierojn klarigi la samajn aferojn.

La Akademio de Esperanto klarigas la vortfaradon surbaze de teorio pri "tri ĉefaj signifo-kategorioj" (*Aktoj de la Akademio*, p. 69 – 70). Ankaŭ *PAG* uzas tian teorion. La klarigoj en *PMEG* principe esprimas la samon, sed per aliaj vortoj.

La vortfarado baziĝas sur vortelementoj kaj signifoj (§37.1).

Farante vortojn oni sekvas tri bazajn principojn:

- Uzo de vortklasaj finaĵoj (§37.2)
- Uzo de precizigaj antaŭelementoj (§37.3)
- Vortigo de frazetoj (§37.4)

Legu ankaŭ pri streĉitaj formoj en §37.5, kaj pri ŝajnaj kunmetaĵoj en §37.6.

Krome oni uzas afiksojn (§38) por fari kunmetaĵojn. Multaj afiksoj sekvas baze la ordinarajn principojn, sed iuj afiksoj sekvas tute proprajn regulojn.

Atentu, ke kunskriboj (§25.3) kiel *membroj-abonantoj*, *nigra-blanka*, *vole-ne-vole*, *pli-malpli* k.s., ne estas rigardataj kiel kunmetaĵoj en *PMEG*.

### 37.1. Vortelementoj kaj signifoj

Ĉiu vortelemento havas per si mem ian signifon. Ĝi estas simbolo de ia ideo.

#### Vortklasaj finaĵoj

La vortelementoj O, A, E kaj I (kaj ankaŭ AS, IS, OS, US kaj U) estas vortklasaj finaĵoj (§37.2). Ili estas tre gravaj en la vortfarado. (Ekzistas ankaŭ la gramatikaj finaĵoj J §8 kaj N §12.2, kiuj ne estas same gravaj en vortfarado, ĉar uzo de tiuj du finaĵoj ne ŝanĝas la bazan signifon de vorto.)

#### Vortetoj

Vortetoj (§3.1) estas jam per si mem vortoj: *por*, *mi*, *jam*, *eĉ*, *tiam*, *anstataŭ*, *je*, *jes* k.a.

#### Radikoj

La plej multaj vortelementoj estas radikoj. Ĉiu radiko havas jam per si mem signifon, sed radiko ne povas aperi memstare kiel vorto. Ĝi bezonas vortklasan finaĵon.

- Kelkaj radikoj montras **homojn, personojn**, ekz.: AMIK, TAJLOR, INFAN, PATR, SINJOR, VIR ...
- Aliaj radikoj montras **bestojn**, ekz.: ĈEVAL, AZEN, HUND, BOV, FIŜ, KOK, PORK ...
- Aliaj estas **kreskaĵoj**, ekz.: ARB, FLOR, ROZ, HERB, ABI, TRITIK ...

- Iuj radikoj estas **iloj**, ekz.: KRAJON, BROS, FORK, MAŜIN, PINGL, TELEFON ...
- Multaj radikoj estas nomoj de **agoj**, ekz.: DIR, FAR, LABOR, MOV, VEN, FRAP, LUD ...
- Aliaj radikoj estas nomoj de **ecoj** aŭ **kvalitoj**, ekz.: BEL, BON, GRAV, RUĜ, VARM, ĜUST, PRET...

Ekzistas multaj diversaj grupoj kaj kategorioj, ne nur la ĉi-antaŭaj. Kelkaj radikoj estas malfacile klaseblaj, iuj havas plurajn signifojn, aliaj havas tre specialan signifon, sed ĉiuj havas ian signifon.

### Kiel eltrovi la propran signifon de radiko?

Ofte la propra signifo de radiko estas pli-malpli evidenta per si mem, sed por certeco necesas zorga komparo de la diversaj uzoj de la radiko kun diversaj finaĵoj, en diversaj kunmetaĵoj k.t.p. Decida estas la O-formo de radiko, ĉar la signifo de la O-formo estas ĉiam identa al la signifo de la radiko mem. Por eltrovi la propran signifon de radiko oni do kontrolu la signifon de ĝia O-formo (se tia estas uzata). Multaj radikoj havas pli ol unu signifon. Tiam ankaŭ la O-formo havas plurajn signifojn. Unu diferenco inter radiko kaj O-vorto estas tamen, ke radikoj estas neŭtralaj pri nombro (§8.2.1).

### La graveco de la radikosignifo

Por ĝuste uzi radikon kun diversaj finaĵoj oni devas koni la propran signifon de la radiko. La gravecon de la radikosignifo bone montras la klasika ekzemplo de la radikoj KOMB kaj BROS.

La du verboj *kombi* kaj *brosi* havas tre similajn signifojn. Ili ambaŭ montras agon, kaj la du agoj estas eĉ tre similaj. Sed se oni ŝanĝas ilin en O-vortojn, ili subite komplete malsimilas:

- *kombo* = la ago kombi
- *broso* = ilo, per kiu oni brosas

La klarigo de tiu ĉi drasta ŝanĝiĝo estas la fakto, ke jam la radikoj havas signifojn. KOMB estas nomo de certa ago, dum BROS estas nomo de certa ilo. Kun O-finaĵo ili estas do nomoj de ago kaj ilo respektive – tre malsimilaj aferoj. Sed kun verba finaĵo ili ambaŭ ricevas agan signifon. KOMB tiam apenaŭ ŝanĝiĝas, ĉar ĝi estas jam aga per si mem. BROS tamen ŝanĝiĝas, kaj montras tiun agon, kiun oni kutime faras per broso.

Se oni deziras O-vorton por tiu ago, kiun oni faras per broso, oni devas fari kunmetaĵon: *bros-ad-o*. Same, se oni deziras vorton por tiu ilo, per kiu oni kombas, oni ankaŭ devas fari kunmetaĵon: *komb-il-o*.

Troviĝas multegaj ĉi tiaj radikparoj, kie la signifo de la verbaj formoj estas similaj, dum la O-formoj estas malsimilaj. La klarigo estas ĉiam, ke la radikosignifoj estas malsamaj. Jen kelkaj ekzemploj: *bati – marteli*, *haki – pioĉi*, *servi – sklavi*, *kudri – tajlori*, *regi – reĝi*, *kaperi – pirati*, *viziti – gasti*. Same oni povas trovi parojn, kie la A-formoj similas, sed la O-formoj malsimilas, ekz.: *eleganta – danda*, *nobla – nobela*, *lerta – majstra*, *kuraĝa –*

*heroa*, *proksima – najbara*, *dolĉa – miela*. Kontrolu mem la signifon de la respondaj O-formoj en vortaro.

Multaj preferas diri, ke temas pri diversaj bazaj vortoj, de kiuj oni deiras en la vortfarado. Ili preferas diri, ke ĉe BROS oni deiras de la baza vorto *broso*, kiu estas nomo de ilo, kaj formas el ĝi la verbon *brosi* (per anstataŭigo de O per I). Ĉe KOMB tamen, laŭ tia klarigomaniero, la baza vorto estas *kombi* (kiu kompreneble nomas agon). El *kombi* oni povas fari la agan O-vorton *kombo* (per anstataŭigo de I per O), kaj la vorton por la ilo, kiun oni normale uzas por kombi, *kombilo* (per aldono de la sufikso IL kaj O-finaĵo). Pro tio, ke la baza formo en unu okazo estas O-vorto, sed en la alia okazo estas verbo, la vortfarado rezultigas diversspecajn vortojn. Tia klarigomaniero estas tute bona, kaj verŝajne por multaj pli natura. Tia parolo pri bazformoj esence estas la sama afero, kiel parolado pri propra signifo de radikoj. Se radiko estas laŭ sia signifo aga, tiam oni nature vidas por ĝi la verban formon kiel bazan. Se radiko estas eca, tiam oni nature vidas la A-finaĵan formon kiel bazan. Se radiko signife estas nek aga, nek eca, tiam oni nature rigardas ĝian O-formon kiel bazan. Ankaŭ ĉi-poste en *PMEG* multaj vortfaraj fenomenoj estas prezentataj tiel, ke oni faras unu vorton el alia vorto ekz. per anstataŭigo de la finaĵo.

## Radikoj en vortaroj

**Agaj radikoj** estas ofte nomataj **verbaj** aŭ **verbkarakteraj**, ĉar ĉe ili oni nature vidas la verbon kiel bazan formon. Tial agaj radikoj normale aperas en vortaroj en verba formo aŭ en artikolo kun verba kapvorto.

**Ecaj radikoj** estas ofte nomataj **A-vortaj** aŭ **A-karakteraj**, ĉar ĉe ili oni vidas la A-finaĵan formon kiel bazan. Tial ecaj radikoj estas do normale prezentataj kiel A-vortoj en vortaroj. Ankaŭ radikoj, kiuj plej ofte aperas kun E-finaĵo, estas tradicie nomataj A-karakteraj.

**Radikoj nek ecaj, nek agaj** estas ofte nomataj **O-vortaj** aŭ **O-karakteraj**. Ili estas normale prezentataj kiel O-vortoj en vortaroj.

Bedaŭrinde multaj vortaristoj ne vere kontrolis la signifon de ĉiuj radikoj. Tial oni iafoje erare prezentas ekz. agan radikon kiel O-vorton, aŭ aĵan radikon kiel verbon.

> **Noto:** Ankaŭ la grava vortaro *PIV* prezentas iujn radikojn nekonsekvence. Jen ekzemploj: DEMONSTRACI aperas kiel O-vorto, sed DEMONSTR kiel verbo, kvankam *demonstracio* kaj *demonstro* ambaŭ estas agaj kaj preskaŭ samsignifaj. KONKURENC aperas kiel O-vorto, sed KONKUR kiel verbo, kvankam ambaŭ estas agaj.

*PMEG* tamen ne uzas tian dividon en verbaj, A-vortaj kaj O-vortaj radikoj, sed preferas paroli pri la propra signifo de radiko.

## Mito pri unusignifaj vortelementoj

Multaj pensas, ke vortelementoj havas (aŭ havu) en Esperanto nur po unu signifon. Tiel neniam estis, kaj tiel neniam povus esti. Sufiĉas malfermi vortaron por nuligi tiun ideon.

Ekzistas eĉ homonimoj (samformaj vortelementoj kun tute senrilataj signifoj). La homonimoj en Esperanto estas malmultaj kompare kun aliaj lingvoj, sed ili ja ekzistas, ekz.: AKT (parto de teatraĵo; dokumento), ARTI-

KOL (*la*; skribaĵo en gazeto), DEVIZ (principfrazo; pagilo), KUB (sesflanka objekto; lando), METR (unuo de longo; poezia ritmo). Ĉiuj ekzemploj estas oficialaj radikoj. Kompreneble oni evitu enkonduki novajn homonimojn, se ili povus kaŭzi konfuzon, sed tute ne ekzistas ia malpermeso de homonimoj en Esperanto.

## 37.2. Vortklasaj finaĵoj

### 37.2.1. O-finaĵo

La finaĵo O (§4) aldonas nenion al la propra signifo de radiko. O-vorto estas simple nomo de la afero:

- *amiko*, *tajloro* = nomoj de diversaj homoj
- *ĉevalo*, *azeno* = nomoj de diversaj bestoj
- *krajono*, *broso* = nomoj de diversaj iloj
- *diro*, *faro* = nomoj de diversaj agoj
- *belo*, *bono* = nomoj de diversaj ecoj

Se radiko havas plurajn signifojn, ankaŭ la O-formo havas plurajn signifojn. Ekz. KONSTRU estas ago, rezulto de ago, kaj maniero de ago. La vorto *konstruo* havas la samajn tri signifojn.

O-finaĵon oni povas forlasi (se ne sekvas J-finaĵo aŭ N-finaĵo). Skribe oni tiam uzas apostrofon (§10.1) anstataŭ la O-finaĵo:

- *amiko* = *amik'* = AMIK
- *belo* = *bel'* = BEL
- *diro* = *dir'* = DIR

Tia forlasado de O-finaĵo okazas ordinare nur en poezio.

Kvankam O-finaĵo ne aldonas ian signifon, ĝi ja estas grava el gramatika vidpunkto. O montras, kiel oni povas uzi la vorton en frazo, kaj la aldono de O enkondukas la distingon inter unu-nombro kaj multe-nombro (§8.2).

Participoj kun O-finaĵo (§28.3) sekvas apartajn regulojn.

### 37.2.2. A-finaĵo

La finaĵo A (§5) montras, ke oni priskribas ion.

A = “rilata al la afero, tia kiel la afero” k.s.:

- *amika* = tia kiel amiko, rilata al amiko ...
- *ĉevala* = tia kiel ĉevalo, rilata al ĉevalo
- *dira* = rilata al la ago diro, farata per diro ...
- *bela* = havanta la econ belo

#### A-vortoj el ecaj radikoj

Kiam la radiko de A-vorto havas ecan signifon, la A-vorto normale montras econ. Tiaj A-vortoj ne multe varias laŭ la kunteksto:

- ***bona*** *manĝo* = “manĝo karakterizata de boneco”

- ***rapida*** *aŭto* = “aŭto karakterizata de rapideco”
- *okazaĵo* ***stranga*** = “okazaĵo karakterizata de strangeco”
- ***ruĝa*** *domo* = “domo kiu havas ruĝon kiel econ (kiel koloron)”

En maloftaj okazoj A-vorto kun eca radiko povas ricevi iom specialan signifon:

- ***stulta*** *demando* ≈ “demando farita pro stulteco”. La demando ne estas stulta en normala senco. Ĝi montras stultecon de la demandanto.
- ***laŭta*** *ĉambro* = “ĉambro plena je laŭtaj sonoj”. La ĉambro ne estas laŭta en ordinara senco, sed ĝi enhavas laŭtecon.
- ***ruĝa*** *koloro* = “koloro kiu estas ruĝo”. Ĝi ne havas ruĝon kiel koloron, sed estas mem la koloro ruĝo. *Ruĝa* ĉi tie ne montras econ, sed identecon.

## A-vortoj el ne-ecaj radikoj

Kiam la radiko de A-vorto ne havas ecan signifon, la A-vorto povas montri diversspecajn priskribojn. Ĝenerale la signifo de tia A-vorto multe varias laŭ la kunteksto:

- ***reĝa*** *konduto* = “konduto en maniero karakteriza por reĝo, konduto kun la ecoj de reĝo”
- ***reĝa*** *persono* = “persono kiu estas reĝo, persono de reĝa familio” k.s.
- ***reĝa*** *palaco* = “palaco kiu apartenas al reĝo”
- ***muzika*** *instrumento* = “instrumento uzata por fari muzikon”
- ***muzika*** *klereco* = “klereco pri muziko”
- ***muzika*** *prezento* = “prezento de muziko”

Kiam la radiko de A-vorto havas agan signifon, la A-vorto povas signifi “rilata al la ago”, sed ĝi ankaŭ povas esti simila al ANT-participo (§28.1) kun A-finaĵo:

- ***nutra*** *problemo* = “problemo pri nutrado”
- ***nutra*** *manĝaĵo* = “manĝaĵo kiu povas nutri, kiu havas nutrajn ecojn, nutranta manĝaĵo”
- ***tima*** *homo* = “homo kiu ofte timas, homo karakterizata de timo, timema homo”
- ***tima*** *krio* = “krio pro timo”
- ***zorga*** *esploro* = “esploro farita kun zorgo”
- ***zorga*** *patrino* = “patrino kiu zorgas, zorganta/zorgema patrino”

Prefere oni ne uzu tiajn A-vortojn kun la senco de INT-participo (§28.1). Sufiĉe ofta ekzemplo estas *morta* kun la senco de “mortinta” aŭ “malviva”, ekz. **morta besto** = “ne plu vivanta besto, mortinta besto”. Tio estas evitinda uzo. Prefere oni diru *mortinta*, *senviva* aŭ *malviva*: *Meze sur la planko kuŝis* ***mortinta*** *hirundo.* [FA1.46] *Lia filo mortis kaj estas nun* ***malviva****.* [FE.31] *la reĝo falis* ***senviva****.* [FA4.69]

En la uzado de Zamenhof *morta* havas la sencojn "rilata al morto", "karakterizata de morto" kaj "sen vivo kaj neniam vivinta". Lia uzo estas imitinda:

- ***Morta** malvarmo ektremigis liajn membrojn* [FA1.194] = "malvarmo de morto".
- *Ŝia vizaĝo aperigis jen **mortan** palecon, jen koloron de sango* [M.159] = "palecon similan al tiu de morto".
- *La genio de sinjoro Schleyer ne trovis necesa fari kun sia elpensaĵo iajn provojn praktikajn, kaj* [la planlingvo] *Volapük restis tute **morta**.* [OV.267] Volapük neniam ekvivis.

Zamenhof uzis *morta* ankaŭ por "tia, ke ĝi devas iam morti": *La korpo estas **morta**, la animo estas senmorta.* [FE.31] = "La korpo devas morti ...". Nuntempe oni tamen uzas *mortema* (§38.2.11) por tiu senco.

## Aga radiko sed eca signifo

A-vorto kun aga radiko normale havas ian signifon laŭ la ĉi-antaŭaj klarigoj, sed iuj tiaj A-vortoj estas uzataj kun signifo pure eca, en kiu la aga signifo de la radiko plene malaperis. Tia uzo ekzistas de la unuaj tempoj, iaokaze eĉ ĉe Zamenhof, sed nur ĉe limigita grupo de radikoj. Ne temas pri vortfara principo ĝenerale uzebla. Tia uzo estas do esence neregula. Ĝi povas kaŭzi problemojn kaj miskomprenojn, kaj estas tial evitinda:

- *korekti* = "senerarigi" → ***korekta***

  1. (bona sed malofta uzo) = "rilata al korektado, senerariga": ***korektaj** principoj* = "principoj pri korektado", ***korekta** edukado* = "edukado, kiu korektas (kiu forigas erarojn)".

  2. (evitinda sed ofta uzo) = "senerara": *****korekta** teksto** = "senerara teksto". *Ĝi ne estas sufiĉe ****korekta****.* [M.75]

- *kompliki* = "ĝene malsimpligi" → ***komplika***

  1. (bona uzo) "rilata al komplikado, komplikanta": ***komplika** faktoro* = "faktoro, kiu kaŭzas (ĝenan) malsimplecon".

  2. (evitinda sed ofta uzo) = "ĝene malsimpla": *****komplika** rezonado** = "(ĝene) malsimpla rezonado", *****komplikaj** reguloj** = "malsimplaj reguloj".

- *konfuz/i* = "malordigi, malklarigi, perpleksigi, intermiksi" → ***konfuza***

  1. (bona uzo) = "rilata al konfuzado, tia ke ĝi kaŭzas malordon, malklarecon aŭ perpleksecon": ***konfuzaj** demandoj* = "demandoj, kiuj konfuzas (kiuj kaŭzas perpleksecon)", ***konfuzaj** vortoj* [OV.319] = "vortoj, kiuj konfuzas (kiuj kaŭzas miskomprenojn)".

  2. (evitinda sed ofta uzo) = "malorda, malklara, perpleksa": *****konfuzaj** pensoj** = "malordaj pensoj", *****konfuza** impreso** = "malorda (konfuzita) impreso". La distingo inter la bonaj kaj malbonaj uzoj de *konfuza* povas esti iom subtila, ĉar tio, kio mem estas malorda ofte pro tio ankaŭ kaŭzas malordon.

- *miksi* = "intermeti senorde" → ***miksa***

1. (bona uzo) = “rilata al miksado, senordiga”: ***miksa*** *teĥniko* = “teĥniko de miksado”.

2 (evitinda uzo) = “miksita, diverseca”: *****miksaj*** *sentoj**.

- *veki* = “interrompi ies dormon” → ***veka***

  1. (bona uzo) = “rilata al vekado, vekanta”: ***veka*** *signalo* = “signalo, kiu vekas”.

  2. (evitinda uzo) = “ne (plu) dormanta”: **Mi estas* ***veka*** *jam de du horoj.**

- *fermi, malfermi* = “igi netrairebla/nealirebla”, “igi trairebla/alirebla” → ***ferma***, ***malferma***

  1. (bona uzo) = “rilata al (mal)fermado, (mal)fermanta”: ***(mal)ferma*** *horo* = “horo de (mal)fermado”.

  2. (evitinda uzo) = “(mal)fermita”: **Hodiaŭ la vendejoj estas* ***(mal)fermaj****.**

  **Noto:** La esprimo *malferma tago* povas ŝajni erara, sed estas tute regula. Malferma tago de oficejo estas tago, en kiu oni aparte malfermas la oficejon al la publiko. Ĝi estas tago de (speciala) malfermado. Ne temas pri malfermita tago.

- *suspekti* = “sen pruvo pensi, ke io estas malbona aŭ ke iu estas kulpa” → ***suspekta***

  1. (bona uzo) =“rilata al suspektado, suspektanta”: ***suspekta*** *mieno* = “mieno, kiu esprimas suspektadon (mieno de suspektanta persono)”.

  2. (evitinda uzo) = “tia ke ĝi vekas suspekton, suspektinda”: *Mi ne volis trinki la vinon, ĉar ĝi enhavis en si ian* ***suspektan*** *malklaraĵon.* [FE.35] Jam delonge apenaŭ iu uzas la vorton *suspekta* en tiu stranga maniero. Anstataŭe oni uzas la tute logikan formon *suspektinda* (ankaŭ eblas *suspektiga*). Tiun unikan kaj izolitan ekzemplon en la *Fundamento* oni do rigardu kiel evitindan arĥaikaĵon.

Ofte tia evitinda A-vorto similas sence al pasiva participo kun AT aŭ IT (§28.1): **komplika** (“malorda”) ≈ *komplikita*, **korekta** (“senerara”) ≈ *korektita*. Sed la sencoj ne estas egalaj. Ĉe la neparticipaj simplaj (kaj evitindaj) formoj temas nur pri la eco (la ago eble tute ne okazis). La respondaj participaj formoj tamen ĉiam montras, ke la ago okazis aŭ okazas.

## Evitinda uzo

Se oni uzas tiajn A-vortojn kun nure eca (ne-aga) senco, oni povas doni la impreson, ke la radikoj mem estas ecaj. Tio povas kaŭzi, ke oni erare aldonas IG-sufikson (§38.2.17) al la verbaj formoj uzante *kaŝigi* anstataŭ *kaŝi*, *vekigi* anstataŭ *veki*, *komplikigi* anstataŭ *kompliki*, *korektigi* anstataŭ *korekti*, k.t.p. Tiaj IG-formoj tamen havas aliajn tre specialajn signifojn: *kaŝigi* = "igi iun kaŝi ion", *vekigi* = "igi iun veki iun", *komplikigi* = "igi iun kompliki ion" k.t.p. Tio ankaŭ povas kaŭzi, ke la simplaj verbaj formoj mise uziĝas kun la signifo "esti tia". *Korekti* ne signifas "esti senerara", sed "igi senerara". *Kompliki* ne signifas "esti malsimpla", sed "malsimpligi". Oni do prefere ne plu uzu tiajn vortojn kiel *korekta*, *komplika* k.t.p. en tia nenormala maniero. Oni uzu *korekta* nur kun la senco "rilata al korektado", *komplika* nur por "rilata al komplikado" k.t.p. Se oni volas esprimi la ideon "senerara", oni uzu *senerara* aŭ *ĝusta*. Se oni volas esprimi la ideon "malsimpla", oni diru *malsimpla*, k.t.p.

**Noto:** En la komencaj tempoj la principoj por fari A-vortojn el ne-ecaj radikoj ne estis klare vortumitaj. Tial oni iafoje kreis tiajn vortojn intuicie kaj improvize, kaj ne malofte sub influo de similaj formoj en naciaj lingvoj. Pro tio enkondukiĝis en la lingvon tiaj ĉi A-vortoj kun neregulaj sencoj. Kvankam oni povas trovi tian uzon ĉe Zamenhof kaj ĉe multaj aliaj gravaj esperantistoj, kaj en unu okazo eĉ en la Fundamento, temas klare pri neregulaĵoj. La grava gramatiko *PAG* mem uzadis *korekta* kun la signifo "senerara", kaj tute ne avertis kontraŭ tia uzo. Kaj la unuaj versioj de *PMEG* eĉ provis defendi tian uzon. Sed multaj firme opinias, ke tia uzo estas malbona kaj evitinda, kaj fakte ili pravas.

### *Falsi* kaj *falsa*

Iom speciala okazo de A-vorto el aga radiko estas la vorto *falsa*:

- *falsi* = 1. "trompe ŝanĝi ion farante ĝin malaŭtentika": *falsi dokumenton*, *falsi historion*, 2. "trompe krei ion malaŭtentikan kiel imiton de io valora": *falsi monon*, *falsi subskribon*.
- *falsa* = 1. "karakterizata de falsado": *falsa interpreto*, *falsa atesto*, 2. "malaŭtentika, falsita": *falsa dokumento*, *falsa mono*, *falsa subskribo*, *falsaj dentoj*. La dua signifo estas pli ofta.

Principe tio estas simila al la ĉi-antaŭe montritaj ekzemploj *korekti*/*korekta*, *kompliki*/*komplika* k.t.p. Sed la uzo de *falsa* por "malaŭtentika" kaj "falsita" estas tre ofta kaj firme enradikiĝinta (kaj ankaŭ zamenhofa), kaj la rilato inter *falsi* kaj *falsa* estas sufiĉe kompleksa. Tial ŝajnas, ke oni devas akcepti (aŭ almenaŭ toleri), ke la vorto *falsa* estas tiamaniere uzata. Oni tamen atentu, ke *falsa* ne signifas simple "malĝusta/malvera". *Falsa respondo* ne estas nur malĝusta respondo, sed respondo, kiu intence prezentas malveron por trompi. La respondalternativoj en kvizo do ne estas *korektaj* kaj *falsaj*, sed *ĝustaj* kaj *malĝustaj* aŭ *pravaj* kaj *malpravaj*.

En la *Baza Radikaro Oficiala* la Akademio de Esperanto en 1974 akceptis kaj aprobis tian tradician ecan uzon de *falsa*, deklarante, ke la radiko FALS havas du apartajn signifojn, unu agan kaj unu ecan.

Sed tamen oni kompreneble povas kaj rajtas uzi *malaŭtentika* kaj *falsita* anstataŭ *falsa*, se oni tion preferas.

### 37.2.3. E-finaĵo

La vortfara uzo de la finaĵo E (§6) tre similas al la uzo de A-finaĵo (§37.2.2).

E = "rilate al la afero, tiel kiel la afero" k.s.:

- *tajlore* = tiel kiel tajloro, rilate al tajloro
- *krajone* = tiel kiel krajono, simile al krajono, per krajono
- *labore* = rilate al laboro, per laboro
- *blanke* = tiel kiel la koloro blanko

#### E-vortoj el ecaj radikoj

Kiam la radiko de E-vorto havas ecan signifon, la E-vorto normale montras manieron. Tiaj E-vortoj ne multe varias laŭ la kunteksto:

- *veturi* ***rapide*** = "veturi kun alta rapideco"
- ***strange*** *granda* = "granda en stranga maniero"
- ***ruĝe*** *farbita* = "farbita per ruĝo"

#### E-vortoj el ne-ecaj radikoj

Kiam la radiko de E-vorto ne havas ecan signifon, la E-vorto montras diversajn signifojn depende de la radiko kaj depende de la kunteksto:

- ***reĝe*** *konduti* = "konduti en maniero karakteriza por reĝo"
- ***reĝe*** *riĉa* = "tiel riĉa kiel reĝo, riĉa en reĝa maniero"
- *loĝi* ***urbe*** = "loĝi en urbo"
- *okazi* ***tage*** = "okazi en tago"

Se la radiko havas agan signifon, la E-formo povas signifi "rilate al la ago, karakterizate de la ago" k.s. La signifo ofte estas simila al ANT-participo aŭ INT-participo kun E-finaĵo (§28.2):

- *konduti* ***time*** = "konduti kun timo, karakterizate de timo, montrante timon, timante"
- ***zorge*** *esplori* = "esplori kun zorgo, zorgante, zorgeme"
- ***morte*** *danĝera* = "tiel danĝera ke estas risko de morto"
- ***morte*** *malami* = "malami ĝis la morto"

#### Aga radiko sed eca signifo

Ĉe iuj E-vortoj, la signifo iafoje estas maniera, kvankam la radiko estas aga:

- *Mi parolas en ĝi* [= la franca lingvo] *sufiĉe* ****korekte**** *kaj facile.* [M.57]
  = *... sufiĉe senerare ...*

**Tia uzo estas evitinda.** Legu pli detalajn klarigojn pri tiaj vortoj kun A-finaĵo en §37.2.2.

### 37.2.4. Verbaj finaĵoj

I = “fari certan agon (aŭ esti en certa stato), kiu proksime rilatas al la signifo de la radiko”.

La finaĵo I reprezentas ĉi tie ĉiujn verbajn finaĵojn (§26): I, AS, IS, OS, US kaj U.

#### Verboj el agaj radikoj

Aga radiko kun verba finaĵo havas ĉiam sian propran signifon:

- KUR → *kuri* = fari la agon “kuro”
- KONSTRU → *konstrui* = fari la agon “konstruo”

Se unu el la signifoj de plursignifa radiko estas ago, tiu ago estas komprenebla la ago de la verba formo. Ekz. KONSTRU havas plurajn signifojn. Unu el tiuj signifoj estas ago. La verbo *konstrui* havas tial ĝuste tiun agan signifon.

#### Verboj el ne-agaj radikoj

Verbo farita el ne-aga radiko montras agon, kiu iel estas proksima al la radikosignifo. Ofte estas tute evidente, kiu estas tiu ago, sed iafoje oni povas heziti. Ĉe multaj ne-agaj radikoj la tradicio jam fiksis, kiun agan signifon ili ricevas kun verba finaĵo, sed iuj radikoj neniam estas uzataj en verba formo, kaj oni ankoraŭ ne decidis, kiun agan signifon ili havu. Farante verbon el tia radiko oni devas do mem trovi taŭgan agon. Se estas eble, oni komparu kun aliaj similaj radikoj. Iafoje nenia ago vere proksime rilatas al la radiko. Tiam oni eble ne faru verbon el la radiko, ĉar la verbo fariĝus tro malfacile komprenebla.

Se radiko per si mem montras **econ** aŭ **staton**, la verba formo normale signifas “esti tia” aŭ “agi kun tia eco”:

- RAPID → *rapidi* = agi rapide
- AKTIV → *aktivi* = agi aktive, esti aktiva
- PRET → *preti* = esti preta
- KURAĜ → *kuraĝi* = esti kuraĝa, agi kuraĝe

Legu ankaŭ pri verbigo de perverba priskribo en §31.1.

Normale ĉi tia verbo ne signifas “iĝi tia” aŭ “igi tia”. Ĉe ecaj kaj stataj radikoj oni uzas la sufiksojn IĜ (§38.2.18) kaj IG (§38.2.17) por krei tiajn signifojn.

Se la radiko montras **ilon, aparaton** aŭ simile, la verbo normale signifas “uzi tian ilon en ĝia kutima maniero”:

- BROS → *brosi* = uzi broson (en normala maniero)
- TAMBUR → *tamburi* = ludi per tamburo, bati tamburon
- FINGR → *fingri* = tuŝi per fingro
- AŬT → *aŭti* = iri per aŭto

Se la radiko montras **substancon**, la verbo normale signifas "provizi per tia substanco":

- AKV → *akvi* = provizi per akvo, verŝi akvon (sur ion)
- OR → *ori* = kovri per oro
- AER → *aeri* = plenigi per aero

En ĉi tiaj verboj oni iafoje uzas la sufikson UM (§38.2.31), ofte senbezone, aŭ la neoficialan sufikson IZ (§39.1.22), plej ofte same senbezone.

Se la radiko montras **personon, homon**, la radiko normale signifas "agi kiel tia persono", "roli kiel tia homo":

- TAJLOR → *tajlori* = labori kiel tajloro, kudri kiel tajloro
- GAST → *gasti* = esti gasto (ĉe iu), loĝi kiel gasto
- REĜ → *reĝi* = regi kiel reĝo, esti reĝo (super io)

**Bestaj radikoj** kaj diversaj **fenomenaj radikoj** signifas en verba formo "agi kiel tia besto aŭ fenomeno":

- HUND → *hundi* = agi kiel hundo, vivi kiel hundo
- SERPENT → *serpenti* = iri kiel serpento
- OND → *ondi* = fari ondajn movojn

Multaj **diversaj radikoj** ricevas verban signifon, kiu ne estas klarigebla per alia regulo ol la tute ĝenerala, ke ili ricevas verban signifon, kiu iel proksime rilatas al la signifo de la radiko:

- FIŜ → *fiŝi* = provi kapti fiŝojn, fiŝkapti
- POŜT → *poŝti* = transdoni (ekz. leteron) al la poŝto
- FIN → *fini* = meti finon, kaŭzi finon
- ORIENT → *orienti* = decidi aŭ fiksi la pozicion (de io) rilate al oriento
- REGUL → *reguli* = gvidi la funkciadon de maŝino k.s. laŭ iaj reguloj

### Objektaj kaj senobjektaj verboj

Se la radiko mem montras agon, tiu aga signifo estas jam per si mem laŭsence tia, ke ĝi povas aŭ ne povas esti direktita al rekta objekto: SID = *sido* (estado en certa pozicio, ago laŭsence senobjekta) → *sidi* (senobjekta verbo), KUR = *kuro* (moviĝo, ago laŭsence senobjekta) → *kuri* (senobjekta verbo), PAF = *pafo* (ago laŭsence objekta) → *pafi* (objekta verbo), POSTUL = *postulo* (ago laŭsence objekta) → *postuli* (objekta verbo).

Kiam oni elektas verban signifon por ne-aga radiko, tiam oni elektas ankaŭ, ĉu ĝi estu objekta aŭ senobjekta. Nenia regulo decidas pri tio. Legu ankaŭ pri verboj kun kaj sen IG en §38.2.17, kaj pri objektaj kaj senobjektaj verboj en §30.

## 37.3. Precizigaj antaŭelementoj

Oni ofte kunigas radikojn (kaj vortetojn) kreante kunmetitajn vortojn. La plej ofta speco de vortkunmetaĵo nomiĝas en *PMEG* **kombino**. Tia vorto

konsistas el du partoj: **ĉefelemento**, kiu donas la ĝeneralan signifon de la vorto, kaj **preciziga antaŭelemento**, kiu precizigas la ĝeneralan signifon.

El la ĉefelemento ŜIP oni povas fari ekz. la jenajn kombinojn (ĉiam kun "neŭtrala" O-finaĵo):

- *vaporŝipo* = speco de ŝipo, nome tiu speco, kiu funkcias per **vaporo**
- *balenŝipo* = speco de ŝipo, nome ŝipo speciale konstruita por ĉasi **balenojn**
- *puŝŝipo* = speco de ŝipo, kiu **puŝas** barĝojn en kanaloj kaj riveroj
- *aerŝipo* = speco de ŝipo, kiu iras en **aero** anstataŭ akvo

La baza signifo de tiuj ĉi kombinoj estas ĉiam "ŝipo". Per diversaj antaŭelementoj oni distingas diversajn specojn de ŝipoj. La antaŭelementoj estas tre diversecaj. VAPOR montras manieron funkciigi la ŝipospecon, BALEN montras celon por la uzado de la ŝipospeco, PUŜ montras taskon, AER montras lokon.

El la ĉefelemento IR, oni povas krei nomojn de diversaj ir-specoj:

- *rondiro* = tia iro, kiun oni faras **ronde**, en **rondo**
- *piediro* = iro per **piedoj**
- *militiro* = iro cele al **milito**

El la ĉefelemento RUĜ, oni povas krei ekz. la jenajn specojn de ruĝo:

- *helruĝo* = tia ruĝo, kiu estas pli **hela** ol normala ruĝo
- *sangruĝo* = tia ruĝo, kian havas **sango**
- *matenruĝo* = ruĝo de la ĉielo en la **mateno**

## Partaj kombinoj

Plej ofte antaŭelementoj distingas diversajn specojn. Iafoje tamen temas ne pri speco, sed pri parto de la ĉefelemento, ekz.: *antaŭbrako* = "tiu parto de brako, kiu troviĝas plej **antaŭ** la korpo"; *Orient-Eŭropo* = "la **orienta** parto de Eŭropo".

## Kvazaŭ propraj radikoj

Kombino kondutas kiel simpla radiko. Ĝi povas akcepti ĉiun ajn finaĵon: *vaporŝipo*, *vaporŝipa*, *vaporŝipe*, *vaporŝipi*; *rondiro*, *rondira*, *rondire*, *rondiri*; *piediro*, *piedira*, *piedire*, *piediri*; *helruĝo*, *helruĝa*, *helruĝe*, *helruĝi*. Aldonante finaĵon al kombino oni sekvas la samajn principojn kiel por simplaj radikoj (§37.2).

## Kombinoj el kombinoj

Oni povas el kombinoj fari novajn kombinojn:

- *vaporŝipasocio* = "asocio, kiu okupiĝas pri vaporŝipoj". Ĉefelemento estas la radiko ASOCI. Preciziga antaŭelemento estas la kombino VAPORŜIP.
- *vaporŝipasociano* = "ano de vaporŝipasocio". Ĉefelemento estas la radiko AN. Antaŭelemento estas la kombino VAPORŜIPASOCI.

- *ŝarĝvaporŝipo* = "vaporŝipo uzata por transporti ŝarĝojn". Ĉefelemento estas la kombino VAPORŜIP. Antaŭelemento estas la radiko ŜARĜ.

Kombino el pluraj radikoj povas teorie esti plursignifa. Neniu gramatika regulo klarigas, ke ekz. *ŝarĝvaporŝipo* estas *ŝarĝ-vaporŝipo* kaj ne *ŝarĝvapor-ŝipo* ("ŝipo, kiu iel rilatas al ŝarĝvaporo", sensencaĵo). Oni devas simple mem kompreni, kiu el pluraj teorie eblaj analizoj kaj signifoj estas la ĝusta. Konfuzoj nur malofte okazas en la praktiko. Skribe oni je bezono povas uzi dividostrekojn por klareco, kiel en *ŝarĝ-vaporŝipo*. Ĝenerale kombinoj kun pli ol tri aŭ kvar radikoj povas esti tro malfacilaj. Anstataŭ **vaporŝipasocimembrokunvenejo** oni prefere diru ekz. *kunvenejo por membroj de vaporŝipasocio*.

## Interligaj finaĵoj

Post preciziga antaŭelemento oni povas meti interligan O-finaĵon por faciligi la elparolon aŭ komprenon de la kombino: *puŝoŝipo*, *aeroŝipo*, *sangoruĝo* k.t.p. En kelkaj vortoj oni emas uzi tian O-finaĵon ne pro ia vera bezono en Esperanto, sed ĉar la antaŭelemento finiĝas per O en aliaj lingvoj. Oni uzas plej ofte ekz. *radioelsendo* anstataŭ la simpla *radielsendo* pro tio, ke la vorto *radio* ĉiam havas finan "o" en aliaj lingvoj. Kompreneble oni povas ellasi O, ĉar en Esperanto ĝi ne estas parto de la radiko, sed nura finaĵo.

Oni ne uzas ligfinaĵon en tiaj kombinoj, kie la antaŭelemento plej nature fariĝas A-vorto, se oni disigas la kombinon, ekz.: *dikfingro* [Jĝ.1] = "fingrospeco, kiu kutime estas pli **dika** ol la aliaj fingroj". Apenaŭ eblas la signifon klarigi en natura maniero uzante la vorton *diko*. Tial oni ne diras **dikofingro**, nek **dikafingro**, sed je bezono *dika fingro*. La alternativo al *grandmagazeno* estas *granda magazeno* (ne **grandomagazeno** aŭ **grandamagazeno**), ĉar la signifo estas "magazenspeco aparte **granda**". Anstataŭ *Nov-Zelando* oni povas diri *Nova Zelando* (ne **Novo-Zelando** aŭ **Nova-Zelando**). Simile estas ĉe agaj vortoj, kie la preciziga antaŭelemento montras econ, kiu rezultas el la ago: *ruĝfarbi → farbi **ruĝa**, farbi tiel ke io fariĝas **ruĝa***; *plenŝtopi → ŝtopi **plena***; *satmanĝi → manĝi ĝis oni estas **sata***. Ankaŭ en tiaj kombinoj oni ne uzas ligfinaĵon. Same en agaj kombinoj, kie la antaŭelemento montras la manieron de la ago, oni kutime ne uzas ligfinaĵon, sed preferas je bezono disigi la kombinon: *laŭtlegi → legi **laŭte***.

Formoj kiel *nigra-blanka* ne estas kombinoj, sed du apartaj vortoj kunskribitaj por speciala nuanco (§25.3).

Se la antaŭelemento estas vorteto (tia vorto, kiu ne bezonas finaĵon), oni normale ne uzas ligan finaĵon. Je bezono oni tamen povas uzi ligan E-finaĵon: *postsigno → postesigno* (faciligas la elparolon), *postulo → posteulo* (faciligas la komprenon). Tio tamen okazas nur tre malofte.

Aliaj finaĵoj ol E povas aperi post vorteta antaŭelemento nur kiam tio aldonas necesan signifon: *unuaeco* = "la eco esti unua" (*unueco* = "la eco esti kiel unu"), *antaŭeniri* = "iri antaŭen" (*antaŭiri* = "iri antaŭ io"). La ligon EN (E + N) oni uzas iafoje ankaŭ post radikaj antaŭelementoj: *supreniro*, *ĉieleniro* (aŭ *ĉieliro*), *hejmenvojaĝo* (aŭ *hejmvojaĝo*).

E kiel ligfinaĵo aperas iafoje, kiam la antaŭelemento estas la radiko MULT: *multe-nombro*. La E-vorto *multe* estas ofte uzata kvazaŭ ĝi estus O-vorto (§24.3).

En kombinoj el aga radiko plus POV, VOL aŭ DEV, oni normale uzas I kiel ligfinaĵon: *pagipova*, *vivivola*, *pagideva*. Estas pli bone klarigi tiajn formojn kiel frazetvortojn (§37.4). Oni povas ankaŭ uzi O en tiaj vortoj: *pagopova*, *vivovola*, *pagodeva*. Tiam ili estas kombinoj, sed O en tiaj vortoj estas malpli kutima. Oni povus principe ankaŭ uzi ilin tute sen ligfinaĵo: *pagpova*, *vivvola*, *pagdeva*, sed tiajn formojn oni apenaŭ uzas en la praktiko.

Se la ĉefelemento estas sufikso, aŭ se la antaŭelemento estas prefikso, tiam oni ne uzas ligfinaĵon (§38.1).

En alia speco de kunmetaĵo, frazetvortoj (§37.4), oni uzas ligfinaĵojn laŭ aliaj reguloj.

### Vortetoj en kombinoj

Iuj vortetoj estas ofte uzataj kun finaĵoj. Ankaŭ al tiaj vortoj oni povas almeti precizigan antaŭelementon:

- *mil → milo → jarmilo* = milo da jaroj, tia milo kiu konsistas el jaroj (ekzistas ankaŭ la samsignifa frazetvorto *miljaro*, §37.4)
- *jes → jeso → kapjeso* = jeso per la kapo (per kapoklino)
- *ekster → ekstero → domekstero* = ekstero de domo

Iafoje oni uzas antaŭelementon antaŭ vorteto sen finaĵo. Tiam la tuta kombino restas vorteto. La antaŭelemento de tia kunmetaĵo estas preskaŭ ĉiam prefikso: *maltro*, *malantaŭ*, *ekde*, *disde*. Tiaj kunmetaĵoj ne ĉiam estas veraj kombinoj (§38.1). La kunmetaĵoj *antaŭhieraŭ* kaj *postmorgaŭ* (§14.2.4) estas iasence kombinoj, sed havas iom specialajn signifojn.

Iafoje oni uzas ordinaran radikon, ekz. KELK (§38.4.1), kiel precizigan antaŭelementon de vorteto sen finaĵo: *kelkdek*[M.199], *kelkiom*, *aliiam*, *aliiuj*. Tia vortfarado estas tamen tre malofta.

Kunmetado de nombraj vortetoj sekvas specialajn regulojn (§23.1.1): *dudek*, *tridek*, *ducent*, *tricent*.

### Precizigo de tuta radikvorto

Iafoje preciziga antaŭelemento precizigas jam pretan radikvorton. Ofte tia kunmetaĵo fariĝus sensenca, aŭ ekhavus tute alian signifon, se oni ŝanĝus finaĵon. Tiaj kombinoj estas tamen tre maloftaj:

- RAPID → *rapidi* → *forrapidi* = moviĝi for rapide. **Forrapido**, **forrapida** aŭ **forrapide** ne havas sencon. La preciziga antaŭelemento FOR havas sencon nur rilate al la aga signifo de *rapidi*. Se oni forprenas la verban finaĵon, la aga senco malaperas. Oni povas alternative aldoni *for* al la kunmetaĵo RAPID-AD → *forrapidado*, *forrapidadi*, *forrapidada*, *forrapidade*. Tiam ne estas problemo, ĉar AD ĉiam montras la agan signifon.

- GLU → *glui* → *alglui* = fiksi al io per gluo. **Algluo** devus esti speco de gluo, kiu iel estas karakterizata de la ideo *al*, sed tio ne donas sencon. En *alglui* la elemento *al* rilatas al la ago fiksi, sed sen verba finaĵo la ideo "fiksi" malaperas.
- ORANĜ → *oranĝa* → *heloranĝa* = oranĝkolora en hela maniero. **Heloranĝo** devus esti speco de oranĝo, iel karakterizata de heleco. Tia oranĝospeco ne ekzistas (sed povus ekzisti). En *heloranĝa* HEL karakterizas la oranĝkoloron. En **heloranĝo** HEL karakterizas la oranĝon.

Tio ĉi estas pli ofta ĉe prefiksoj (§38.3). Se la prefikso havas sencon nur rilate al la tuta origina vorto, oni ne povas libere ŝanĝi finaĵon: *malgrasa*, *malpara*, *malbutoni*, *ekflori*, *respeguli*, *distrumpeti* k.a.

Iafoje oni tamen provas uzi ĉi tiajn vortojn kun alia finaĵo (§37.5).

## Klarigado de kombinoj

Ofte oni povas klarigi la signifon de kombino per rolvorteto:

- *aerŝipo* = "ŝipo **por** aero"
- *lignotablo* = "tablo **el** ligno"
- *skribtablo* = "tablo **por** skribo"
- *lumradio* = "radio **de** lumo"
- *piediro* = "iro **per** piedoj"
- *ŝlosilo* = "ilo **por** ŝlosi"
- *pordŝlosilo* = "ŝlosilo **por** pordo(j)"
- *arbaropromenado* = "promenado **en**/**tra** arbaro"

Sed ne ĉiuj kombinoj estas tiel klarigeblaj. Iuj bezonas pli ampleksan klarigon:

- *vaporŝipo* = "ŝipo, kiu sin movas per vaporo" ("ŝipo de/per ... vaporo" ne donas sencon).
- *dikfingro* [Jĝ.1] = "fingro de tiu speco, kiu estas kutime pli dika ol la aliaj fingroj" ("fingro de diko" estas sensencaĵo).
- *novluno* = "tiu aspekto, kiun la luno havas, kiam ĝi estas kvazaŭ nova (en la unua fazo)".
- *sovaĝbesto* = "tia besto, kiu estas karakterizata de sia sovaĝeco".

Iuj kredas, ke kombinoj, kiuj ne estas klarigeblaj per rolvorteto, estas eraraj. Tio estas miskompreno. La vorto *vaporŝipo* [FG.55] estas la ĉefa instruekzemplo de vortkunmetado en la *Fundamento* (§40), kaj ĝi ne estas tiel klarigebla. Multegaj tradiciaj, Fundamentaj kaj zamenhofaj vortoj ne estas klarigeblaj per rolvortetoj, sed estas memkompreneble ĝustaj.

## Kombinoj ne estas difinoj

En kunmetita vorto povas kaŝiĝi multaj neesprimitaj ideoj. Kombino konsistas el ĉefelemento, kiu donas la bazan signifon, kaj antaŭelemento, kiu montras ian karakterizaĵon, sed kombino ne estas plena difino de la signifo. La efektiva signifo de kombino dependas ne nur de la signifo de ĝiaj partoj, sed ankaŭ de la lingva tradicio:

- *Terkulturisto* estas "tia isto, kiu okupiĝas ĉefe pri terkulturado". Kutime li okupiĝas ankaŭ pri aliaj aferoj, ekz. bestobredado.
- *Orfiŝo* estas "tia fiŝo, kiu aspektas kvazaŭ ĝi estus el oro". Sed orfiŝo ne vere estas el oro.
- *Ladskatolo* povas teorie esti "skatolo farita el lado" aŭ "skatolo, en kiu oni havas ladon". La tradicio decidis tamen, ke ĝi havas nur la unuan signifon. Ĝi eĉ decidis, ke *ladskatolo* estas ĝuste tia hermetike fermita skatolo el lado, en kiu oni konservas manĝaĵon aŭ trinkaĵon.
- *Falŝirmilo* povas teorie signifi "paraŝuto", "bastono" aŭ "balustrado" (kaj eble ankoraŭ ion alian). La tradicio decidis, ke ĝi estas nur paraŝuto. Tamen pro la dubsenceco de *falŝirmilo* oni emas pli ofte diri *paraŝuto* nuntempe. Tio povas kaŭzi, ke *falŝirmilo* perdos sian limigitan signifon, kaj eksignifos "ia ajn ilo por ŝirmi kontraŭ falo".

Por multaj ideoj ekzistas pluraj teorie same eblaj nomoj. Ofte la tradicio elektis unu, kiun oni normale uzas, dum la aliaj ne aperas. Ekz. *poŝtmarko* povus same bone nomiĝi *poŝtosigno*, *letermarko*, *afrankmarko* aŭ simile, sed la tradicio elektis ĝuste *poŝtmarko*.

**Noto:** Efektive Zamenhof komence uzis *marko de poŝto*, *poŝta signo*, *signo de poŝto* kaj *poŝta marko* antaŭ ol li fine elektis *poŝtmarko*.

## Kombino aŭ priskribo?

Ofte oni hezitas inter ekz. *lada skatolo* kaj *ladskatolo*, *sovaĝa besto* kaj *sovaĝbesto*, *dikfingro* kaj *dika fingro*. Ofte oni povas sendistinge uzi ambaŭ formojn, sed tamen estas esenca diferenco inter kombinoj kaj tiaj duvortaĵoj kun A-vorto kaj O-vorto:

- ‣ Kiam oni faras kombinon, oni kreas vorton por speciala ideo, por certa speco. Oni nomas ian ideon, kiu ial estas rigardata kiel aparta, kaj kiu do bezonas propran vorton.
- ‣ Kiam oni uzas rektan priskribon, oni normale nur montras "okazan" aŭ "hazardan" econ.

- *Lada skatolo* estas skatolo de ĉia ajn speco. Tiu skatolo "hazarde" iel rilatas al lado. Kiamaniere ĝi rilatas al lado, povas montri nur la kunteksto. Eble ĝi estas farita el lado, eble ĝi enhavas ladon k.t.p. *Ladskatolo* tamen estas certa skatolspeco. La preciza signifo de *ladskatolo* estas decidita de la lingva tradicio: "hermetike fermita skatolo el lado, en kiu oni konservas manĝaĵon aŭ trinkaĵon".
- *Sovaĝa besto* estas (unuopa) besto, kiu "hazarde" estas sovaĝa. Ĉu tio estas ĝia normala stato, oni ne scias. *Sovaĝbesto* estas certa bestospeco, kiun karakterizas sovaĝeco.

- *Alta forno* estas ia ajn forno, kiu estas alta. *Altforno* estas speciala forno, en kiu oni produktas feron, kaj kies plej grava parto estas tre alta.
- *Dikfingro* estas certa fingrospeco tiel nomata, ĉar ĝi normale estas pli dika ol la aliaj fingroj. *Dika fingro* estas ĉia ajn fingro (dikfingro, montrofingro, mezfingro, ringfingro aŭ etfingro), kiu "hazarde" estas dika. Unuopa dikfingro povas esti ĉu dika, ĉu maldika, sed restas dikfingro.

Preciziga antaŭelemento do montras, kia estas la speco, ne kia estas la individuo. Priskribo montras normale, kia estas la individuo, sed ĝi povas ankaŭ montri, kia estas la speco, laŭ la kunteksto. Tial oni povas uzi ankaŭ priskribojn por nomi specojn. Oni povas diri *dika fingro* anstataŭ *dikfingro*. Oni povas diri *vapora ŝipo* anstataŭ *vaporŝipo*. Eblas diri *sovaĝa besto* anstataŭ *sovaĝbesto*. Sed ne eblas fari male, ĉar ne ĉiu *dika fingro* estas *dikfingro*, ne ĉiu *vapora ŝipo* estas *vaporŝipo*, kaj ne ĉiu *sovaĝa besto* estas *sovaĝbesto*.

### Eca radiko kiel antaŭelemento

Estas ofta miskompreno, ke oni ne povus fari kombinojn, en kiuj la antaŭelemento estas eca radiko. Fakte oni regule faradas tiajn vortojn, ekz. *altlernejo*, *altforno*, *dikfingro* [Jĝ.1], *sekvinberoj* [FA1.79], *solinfano* [M.14], *sovaĝbesto*, *sanktoleo*, kaj multajn aliajn. Ili estas tute regulaj. Sed oni ne povas simple kunŝovi O-vorton kun A-vorta priskribo, se oni ne celas ion pli specialan. Oni ne diru *belfloro*, se oni simple volas diri *bela floro*. Oni ne diru *bluokulo* se oni simple celas *blua okulo*. Same kiel *balenŝipo* ne estas ĉia ajn *balena ŝipo* (ekz. balensimila ŝipo), ankaŭ *altlernejo* ne estas simple *alta lernejo*, sed certa speciala speco de lernejo, kiun karakterizas alta nivelo. *Dikfingro* ne estas ia ajn dika fingro, sed fingrospeco, kiu estas kutime pli dika ol la aliaj fingroj. *Sekvinbero* ne estas ia ajn seka vinbero, sed vinbero speciale preparita per sekigo.

Ekz. *belfloro* devas do esti certa florspeco, kiun iel karakterizas beleco. Se ekzistus tia speciala florspeco, ĝi povus nomiĝi *belfloro*. *Bluokulo* devas esti speciala speco de okulo iel karakterizata de bluo (efektive *bluokulo* povus bone esti nomo de okulo batita tiel, ke ĉirkaŭ ĝi estas blue nigra kontuzo = *bluringa okulo*).

### Objekto kiel antaŭelemento

Multaj pensas, ke oni ne povas fari kombinojn, kies ĉefelemento montras agon, kaj kies antaŭelemento montras objekton de tiu ago, ekz.: *leterskribi*, *voĉdoni*, *domkonstrui*. Tio tamen ne estas prava. En tiaj kombinoj la antaŭelemento ne estas ordinara objekto, sed montras karakterizaĵon de agospeco. Tiaj kombinoj signife diferencas de la duvortaĵoj *skribi letero(j)n*, *doni voĉo(j)n* k.t.p. En *skribi leteron* la objekto montras konkretan objekton de la skribado, dum en *leterskribi* LETER nur karakterizas la specon de skribado. En iuj okazoj simpla unuradika verbo havas ĝuste tian signifon (*leteri*, *voĉi*), sed ankaŭ la kombinaj formoj estas tute ĝustaj.

Iaj similaj verboj havas signifonuancon de provado: *fiŝkapti* = “provi kapti fiŝojn”. Tiajn verbojn oni devas klarigi kiel frazetvortojn (§37.4).

## 37.4. Vortigo de frazetoj

Frazeto (ia grupo de kunapartenantaj vortoj) povas kunŝoviĝi en kunmetaĵon per aldono de ia posta elemento. Tio nomiĝas vortigo de frazeto. La rezulto estas **frazetvorto**. En tia vortfarado **ne** validas la principo de preciziga antaŭelemento (§37.3).

El la origina frazeto oni retenas nur la plej gravajn elementojn. Finaĵoj kaj aliaj malpli gravaj elementoj normale forfalas. Por plifaciligi la elparolon aŭ komprenon oni povas tamen konservi vortklasan finaĵon de la origina frazeto, sed J-finaĵojn kaj N-finaĵojn oni ne konservas.

Ĉe vortigo de citaĵoj (vidu ĉi-poste) oni tamen ja konservas J-finaĵojn kaj N-finaĵojn, kaj ĉe kunmetaĵoj kun *sin* (§38.4.3) oni konservas N-finaĵon.

### Vortigo per A-finaĵo aŭ E-finaĵo

Ofte oni vortigas frazparton, kiu havas rolvorteton. Tiaj frazetoj povas roli A-vortece aŭ E-vortece. Estas do logike, ke oni povas ilin transformi en A-vortojn aŭ E-vortojn. La rolvorteto restas, se ĝi estas necesa por la signifo. Alie ĝi povas forfali:

- *sur tablo* → [*sur tablo*]-A → *surtabla*
- *sen fortoj* → [*sen fortoj*]-E → *senforte*
- *inter (la) nacioj* → [*inter nacioj*]-A → *internacia*
- *dum unu tago* → [*unu tago*]-A → *unutaga*
- *en la unua tago* → [*unua tago*]-A → *unuataga*
- *kun blanka ĉapelo* → [*blanka ĉapelo*]-A → *blankĉapela*
- *de la nova jaro* → [*nova jaro*]-A → *novjara*
- *kun sia vizaĝo al la tero* → [*vizaĝo al tero*]-E → *vizaĝaltere*
- *sur tiu flanko* → [*tiu flanko*]-E → *tiuflanke*
- *sur tiu ĉi flanko* → [*ĉi flanko*]-E → *ĉi-flanke* (*ĉi* ofte uziĝas prefiksece, §38.4.3)
- *de/dum/en ... du monatoj* → [*du monatoj*]-a → *dumonata* = ekzistanta jam du monatojn (ekz. *dumonata bebo*), ekzistanta nur du monatojn (ekz. *dumonata festivalo*), aperanta ĉiun duan monaton (ekz. *dumonata gazeto*)
- *en/de ... la dua monato* → [*dua monato*]-A → *duamonata* = rilata al la dua monato
- *en tiu maniero* → [*tiu maniero*]-E → *tiumaniere*
- *en tiu ĉi maniero* → [*ĉi maniero*]-E → *ĉi-maniere*
- *en tia maniero* → [*tia maniero*]-E → *tiamaniere*

Iafoje oni aŭdas formojn kiel **tielmaniere**. Ili estas eraraj. Se oni restarigas la plenan frazeton, oni vidas, ke nur *tiu* aŭ *tia* eblas: *en tiu maniero*, *en tia*

*maniero*, sed ne **en tiel maniero**. Simile oni diru *tiutage* (= “en tiu tago”), ne **tiamtage**.

Ankaŭ frazparto kun N-finaĵo povas vortiĝi, se ĝi rolas E-vortece:

- *Li staris **tutan horon** apud la fenestro.* FE.26 → *Li staris **tut(a)hore** apud la fenestro.*
- *Ili alvenis **pasintan vendredon**.* → *Ili alvenis **pasintvendrede**.*

Okaze oni uzas A-finaĵon aŭ E-finaĵon por vortigi frazeton kun kvanta vorto kaj *da*-esprimo:

- *kun multe da kosto* → [*multe (da) kosto*]-A → *multkosta*, *multekosta*
- *kun multe da brancôj* → [*multe (da) brancôj*]-A → *multebranĉa*, *multbranĉa*. Principe oni ankaŭ povas uzi *kun multaj brancôj* → [*multaj brancôj*]-A → *multabranĉa* aŭ *multbranĉa*, sed praktike oni uzas nur E-finaĵon en tiaj frazetvortoj kun komenca *mult-* (aŭ tute ne uzas ligan finaĵon).

Iafoje oni vortigas kompleksan verbon. Tiam la ĉefverba radiko staru en la fino:

- *povas pagi* → *pagi povas* → [*pagi povas*]-A → *pagipova* = tia, ke oni povas pagi
- *volas scii* → *scii volas* → [*scii volas*]-A → *scivola* = tia, ke oni volas scii
- *povas ĉion (fari)* → *ĉion povas* → [*ĉion povas*]-A → *ĉiopova* = tia, ke oni povas ĉion fari (ne **ĉionpova**, N-finaĵoj forfalas ene de frazetvortoj)

Iafoje oni ĉi tiel vortigas du vortojn, kiuj kune montras unu ideon:

- *nigra kaj blanka* → [*nigra (kaj) blanka*]-A → *nigrablanka* = tia, ke ĝi havas nur la kolorojn nigro kaj blanko

J-finaĵon kaj N-finaĵon oni metas nur fine de tia frazetvorto: *nigrablankaj fotoj*, *nigrablankan foton*, *nigrablankajn fotojn*. Sed ofte oni uzas en tiaj ĉi okazoj anstataŭe kunskribadon (§25.3): *nigra-blanka*. Tiam oni traktas la du A-vortojn kiel du memstarajn vortojn, kaj almetas finaĵojn al ambaŭ vortoj: *nigraj-blankaj fotoj*, *nigran-blankan foton*, *nigrajn-blankajn fotojn*.

## Vortigo per verba finaĵo

Oni ankaŭ povas vortigi frazeton per verba finaĵo. Tiam la verba finaĵo reprezentas ian kaŝitan agon. Kion la verba finaĵo reprezentas, oni devas lerni aparte por ĉiu tia vorto:

- *per laboro* → [*per laboro*]-(akiri)-I → *perlabori* = akiri per laboro. En *perlabori* la verba finaĵo reprezentas la kaŝitan ideon “akiri”. *Perlabori* neniel devenas de la verbo *labori*, sed de la frazeto *per laboro*. En *labori* la aga signifo estas simple LABOR. En *perlabori* la ago estas “akiri”.
- *fiŝojn kapti* → [*fiŝojn kapti*]-(provi)-I → *fiŝkapti* = provi kapti fiŝojn, fiŝi. En *fiŝkapti* la verba finaĵo reprezentas la ideon “provi”. Efektive oni povas longe fiŝkapti sen kapti eĉ unu fiŝon. Ankaŭ la simpla verbo *fiŝi*

havas tian signifon. *Fiŝkapti* diferencas de ekz. *leterskribi* kaj *voĉdoni* (§37.3), kiuj estas kombinoj sen kaŝita ago.

### Vortigo per O-finaĵo

Oni povas vortigi frazeton ankaŭ per O-finaĵo. Tiam la O-finaĵo reprezentas ian kaŝitan ideon. Precize kion la O-finaĵo reprezentas, oni devas lerni aparte por ĉiu tia vorto. En ordinara O-vorto la O-finaĵo nenion signifas. Ordinara O-vorto havas simple la signifon de sia radiko (§37.2.1). En frazetvortigo tamen la O-finaĵo ĉiam reprezentas ian kaŝitan signifon:

- *tri anguloj* → [*tri anguloj*]-(figuro)-O → *triangulo* = figuro kun tri anguloj
- *sub tegmento* → [*sub tegmento*]-(ĉambro/loko)-O → *subtegmento* = ĉambro aŭ loko sub la tegmento (iafoje oni vidas samsence *subtegmentejo*, en kiu EJ, §38.2.10 estas uzata ne kiel sufikso, sed kiel ordinara radiko)
- *ĉirkaŭ kolo* → [*ĉirkaŭ kolo*]-(ĉeno)-O → *ĉirkaŭkolo* = kolĉeno
- *sur vangon* → [*sur vangon*]-(frapo)-O → *survango* = frapo sur vangon
- *per fortoj* → [*per fortoj*]-(trudo)-O → *perforto* = trudado de la propra volo per fortoj
- *unu tago kaj unu nokto* → [*unu tago (kaj) unu nokto*]-(periodo)-O → *tagnokto* = 24-hora periodo, diurno
- *kontraŭ veneno* → [*kontraŭ veneno*]-(rimedo)-O → *kontraŭveneno* = rimedo kontraŭ veneno, antidoto
- *la pli multaj* → [*pli multaj*]-(grupo)-O → *plimulto* = grupo, kiu estas pli multnombra (ol alia)
- *oni diras* → [*oni diras*]-(afero)-O → *onidiro* = afero, kion "oni" diras, famo, klaĉo
- *nova jaro* → [*nova jaro*]-(tago)-O → *novjaro* = tago, en kiu komenciĝas nova jaro
- *mil jaroj* → [*mil jaroj*]-(periodo)-O → *miljaro* = periodo de mil jaroj. La kombino *jarmilo* (§37.3) kaj la frazetvorto *miljaro* havas la saman signifon. Ambaŭ vortoj estas ĝuste konstruitaj. Ili estas faritaj laŭ du malsamaj principoj, sed ambaŭ principoj apartenas al la Esperanta vortfarado. Kombinoj estas tamen ĝenerale pli oftaj kaj pli bazaj, kaj tial fine la kombino *jarmilo* fariĝis pli populara. Sed *miljaro* estas tute bona alternativo, kiu eĉ troviĝas en la *Fundamento*: *Mil jaroj (aŭ milo da jaroj) faras* ***miljaron***. [FE.14]

### Finaĵoj post vortetoj

Aldono de finaĵo post vorteto ofte povas esti rigardata kiel frazetvortigo. Vorteto povas ja aperi senfinaĵe en frazo, kaj estas do kiel tuta frazeto en si mem:

- *hodiaŭ* → *hodiaŭa* = okazanta hodiaŭ, apartena al hodiaŭ, tia kiel hodiaŭ ...

- *tuj* → *tuje* = tiel kiel tuj, en tuja maniero ...
- *anstataŭ* → *anstataŭi* = esti anstataŭ io, roli anstataŭ iu

Ankaŭ en tiaj ĉi frazetvortoj finaĵo povas reprezenti kaŝitan ideon:

- *tro* → [*tro*]-(kvanto)-O → *troo* = kvanto, kiu estas tro granda
- *hodiaŭ* → [*hodiaŭ*]-(tago)-O → *hodiaŭo* = hodiaŭa tago
- *kaŭzo, kial io okazis/estas ...* → [*kial*]-(kaŭzo)-O → *kialo* = motivo, kaŭzo
- *loko, kie io estas* → [*kie*]-(loko)-O → *kieo* = troviĝloko

## Frazetvortigoj kiel antaŭelementoj en kombinoj

Oni ankaŭ uzas "vortigitajn" frazetojn kiel antaŭelementojn de kombinoj. Plej ofte la ĉefelemento estas sufikso:

- *la sama ideo* → [*sama ideo*]-AN-O → *samideano* = speco de ano, nome ano de la sama ideo
- *surda kaj muta* → [*surda (kaj) muta*]-UL-O → *surd(a)mutulo* = speco de ulo, nome ulo, kiu estas kaj surda kaj muta
- *altaj montoj* → [*altaj montoj*]-AR-O → *altmontaro* = aro de altaj montoj
- *sub (la) maro* → [*sub maro*]-ŜIP-O → *submarŝipo* = ŝipo, kiu povas iri sub la mara supraĵo
- *en liton* → [*en liton*]-IG-I → *enlitigi* = "igi en liton", meti en liton
- *volas scii* → *scii volas* → [*scii volas*]-EM-A → *scivolema* = tia, ke oni emas voli scii
- *arte fari* → [*arte fari*]-IT-A → *artefarita* [FA2.65] = kreita per arto, malnatura

Rimarku, ke la kunmetaĵo *artefarita* ne devenas de **artefari**. Tia verbo eĉ ne ekzistas (neniam uziĝas). *Artefarita* devenas de la duvortaĵo *arte fari*. Ĉefelemento estas IT. Preciziga antaŭelemento estas *arte fari*. Similaj vortoj estas la zamenhofaj *desegnekovrita* [M.97] (de *desegne kovri*), *larmelacigita* [M.16] (de *larme lacigi*) kaj *plejamato* [FA2.105] (de *plej ami*).

## Dusignifaj formoj

Iafoje apud frazetvorto, kiu komenciĝas per rolvorteto, ekzistas samforma kombino kun tute alia signifo. Tia kolizio okazas normale nur kiam temas pri A-vorto aŭ E-vorto:

- *antaŭĝardena* (frazetvorto) = "tia, ke ĝi troviĝas antaŭ ĝardeno"
- *antaŭĝardena* (kombino) = "rilata al antaŭĝardeno (tia ĝardeno, kiu troviĝas antaŭ io)"
- *antaŭpage* (frazetvorto) = "antaŭ (la) pago"
- *antaŭpage* (kombino) = "per antaŭpago"
- *suboficira* (frazetvorto) = "(troviĝanta) sub oficiro"
- *suboficira* (kombino) = "rilata al suboficiro(j)"

Legu pli pri rolvortetoj en frazetvortoj kaj kombinoj en §38.4.2.

### Vortigo de citaĵoj

Pli ekstrema kaj pli malofta formo de kunmetado estas vortigo de citaĵoj. En tia vortfarado, kiu estas speco de frazetvortigo, oni faras vorton el tuta eldiro (efektiva aŭ imaga). Oni tiam konservas ĉiam la plenajn vortojn de la origina citaĵo kune kun ĉiuj finaĵoj:

- *"Vivu!"* → [*vivu*]-(krii)-I → *vivui* = krii "vivu!", saluti iun per la krio "vivu!". Rimarku, ke la U-finaĵo restas. Ordinaraj vortoj ne povas havi du vortklasajn finaĵojn unu post la alia. Sed *vivui* ne estas ordinara vorto. Ĝi estas vortigo de citaĵo, kaj la U-finaĵo estas nepre necesa por la signifo. Oni ankaŭ povas formi *vivuo* (salutkrio per "vivu!"), *vivua* (rilata al vivu-kriado), k.t.p.
- *"Ne forgesu min!"* → [*ne forgesu min*]-(floro)-O → *neforgesumino* = la florspeco miozoto (la nomon kaŭzis la blua koloro de la miozotoj, kiu estas simbolo de ama fideleco)
- *"Kiel vi fartas?"* → [*kiel vi fartas*]-UL-O → *kiel-vi-fartas-ulo* = tia esperantisto, kiu neniam lernis diri pli ol "kiel vi fartas?" (= eterna komencanto)

## 37.5. Strecitaj formoj

Strecitaj formoj estas kunmetaĵoj, al kiuj oni donas signifon, kiu principe ne devus esti ebla, ĉar mankas la plej grava elemento. Oni strecis la eblojn de vortfarado.

Frazetvortigo (§37.4) per verba finaĵo aŭ per O-finaĵo estas la ĉefa speco de strecita vortfarado. Ordinare oni devas lerni tiajn vortojn aparte: *triangulo*, *subtegmento*, *survango*, *perforto*, *perlabori*, *vivui*.

Iafoje preciziga antaŭelemento (§37.3) rilatas al tuta vorto kun finaĵo, kaj povas esti neeble ŝanĝi finaĵon. Tio okazas ofte kiam la antaŭelemento estas prefikso. Iafoje oni provas tamen ŝanĝi finaĵon:

- FORM → *formi* → *reformi* → *reformo* = la ago reformi. Nenio en la vorto *reformo* esprimas agon. Principe *reformo* devus esti speco de formo iel karakterizata de RE, sed tio ne havas sencon. La prefikso RE estas tamen ĉiam uzata nur antaŭ agaj vortoj, kaj tial la vorto malgraŭ ĉio kompreniĝas age.
- FLOR → *flori* → *ekflori* → *ekfloro* = ekflorado. *Ekfloro* devus esti "speco de floro karakterizata de EK", sed tio ne havas sencon. *Ekfloro* fariĝas komprenebla kun aga signifo pro la ĉeesto de la prefikso EK. Tiu prefikso havas sencon nur rilate al ago, kaj tial *ekfloro* devas, malgraŭ ĉio, esti aga vorto.

Iafoje oni kreas strangajn kunmetitajn O-vortojn aldonante al jam ekzistanta O-vorto gravan signifon, kiun oni tamen tute ne esprimas. Oni povus diri, ke temas pri frazetvortigo per O-finaĵo:

- *piedpilko* = speco de pilko → [*piedpilko*]-(ludo)-O → *piedpilko* = ludo per piedpilko, futbalo

*Piedpilko* devas laŭ la normalaj reguloj de vortfarado esti speco de pilko. Tamen oni ofte uzas tiun vorton ankaŭ por nomi ludon per piedpilko. Nenio tamen montras agon en la vorto *piedpilko*, kaj nenio iel komprenigas (krom la kunteksto), ke temas pri ago. Estas tre strange nomi kaj la pilkon kaj la ludon per la sama vorto. Tio estas kvazaŭ oni dirus *martelo* por *martelado* aŭ *viro* por *vireco*. Prefere oni nomu la ludon *piedpilkado* (aŭ *futbalo*). Simile estas pri *manpilkado*, *bazpilkado*, *akvopilkado*, *korbopilkado*, *flugpilkado* k.a.

> **Noto:** Oni kritikis la vorton *futbalo* kiel tro naturalisman, sed fakte *piedpilko* por la ludo estas multe pli naturalisma. Oni simple senpense kopiis nelogikan uzon de nacilingva vorto. *Piedpilkado* tamen estas vere skemisma kaj esperanteca vorto.

Iafoje strecitaj formoj estas bonaj kaj akcepteblaj, precipe se ili estas tradiciaj kaj sufiĉe facile kompreneblaj, sed oni ne kreu novajn strecitajn formojn sen grava motivo.

## 37.6. Ŝajnaj kunmetaĵoj

Multaj vortoj aspektas kvazaŭ ili estus kunmetitaj, kvankam ili ne estas. *Kolego* (samprofesiano) povus esti miskomprenata kiel *kol-ego* (longa kolo), *okulo* (vidorgano) povus esti miskomprenata kiel *ok-ulo* (persono karakterizata de la nombro 8), *lumbriko* (speco de vermo) kiel *lum-briko* (briko el lumo), *haringo* (speco de fiŝo) kiel *har-ingo* (ingo de haroj). Aliaj ekzemploj estas *kol-oro*, *vesp-ero*, *voj-aĝo*, *maŝ-ino*, *mis-ilo* k.s. Kiam vorto ŝajnas enhavi afikson, oni parolas pri "ŝajnafikso". Efektive ekzistas tre multe da tiaj vortoj. Ili estas bona materialo por vortludoj kaj ŝercoj, sed ili ankaŭ povas kaŭzi problemojn, precipe por komencantoj.

Ofte oni provis eviti ŝajnafiksojn. Ekz la vorto *planedo* havas "d", kvankam plej multaj lingvoj havas "t" en tiu vorto, por eviti konfuzon kun *planeto* (kun ET-sufikso) = "malgranda plano". La vorto *ripeti* komenciĝas per "ri", kvankam multaj lingvoj havas "re" en tiu vorto. Se la vorto estus **repeti** oni povus miskompreni ĝin kiel *re-peti* (peti denove) kun la prefikso RE. Multaj (sed ne ĉiuj) vortoj, kiuj internacie finiĝas per "ul" havas en Esperanto "ol", por eviti konfuzon kun la sufikso UL. Multaj (sed ne ĉiuj) vortoj, kiuj internacie havas la finon "in", havas en Esperanto la finon "en" por eviti konfuzon kun IN-sufikso. Por kelkaj vortoj ekzistas duoblaj formoj. *Kasedo* kaj *kaseto* havas ekzakte la saman signifon. *Kaseto* povus teorie esti miskomprenata kiel *kas-eto* (malgranda privata kaso) kun la sufikso ET. Tre multaj vortoj tamen retenas radikofinon aŭ radikokomencon, kiu povas ŝajni kiel afikso aŭ radiko. Jam Zamenhof enkondukis multegajn vortojn kun tia ŝajnafikso. Ekzistas ekz. en *PIV* pli ol 150 radikoj kun ŝajna ET-sufikso. 23 el ili aperis jam en la *Fundamento*, kaj 47 el ili estas radikoj, kiujn oni poste oficialigis.

Oni ofte aŭdas kritikon kontraŭ unuopaj vortoj, ke ili estas eraraj, ĉar ili enhavas ŝajnafikson (aŭ alian ŝajnelementon). Tia kritiko povas esti prava, se la vorto efektive povus kaŭzi konfuzon, sed neniel ekzistas ia regulo, ke vortoj ne rajtas enhavi ŝajnafikson en Esperanto. Se miskompreno ne povus estiĝi, tia kritiko estas do malprava.

## Eksafiksoj

Speciala tipo de ŝajnafiksoj ekzistas en vortoj, kiuj en sia origina formo, en alia lingvo, estis kunmetitaj, sed kiujn Esperanto pruntis kiel unu radikon. Kiam pluraj tiaj Esperantaj radikoj havas similan radikofinon aŭ radikokomencon (kiu do estis afikso en la origina lingvo), tio povas ŝajni kiel vera Esperanta afikso. Tian ŝajnafikson oni povas nomi **eksafikso** (ek-ssufikso, eksprefikso). Iafoje oni provas uzi tiajn eksafiksojn ankaŭ en pure Esperantaj vortoj. Ekz. laŭ nekunmetitaj vortoj kiel *psikologio*, *sociologio*, *metodologio* k.a., oni kreis novajn vortojn kiel *esperantologio* kaj *birdologio*, en kiuj OLOGI estas uzata kiel vera afikso. Tiaj novaĵoj povas iafoje esti bonaj, sed oni devas atenti, ke konfuzo ne estiĝu.

Multaj tiaj (ŝajnaj) afiksoj estas traktataj kune kun la neoficialaj afiksoj (§39).

## Vortokunfandoj

Vortokunfandoj (ankaŭ nomataj "kofrovortoj") estas neregulaj vortkunmet-aĵoj, en kiuj la elementoj mallongiĝis kaj kunfandiĝis en kaprica maniero. Tia vortfarado estas populara en iuj lingvoj, sed evitinda en Esperanto. Plej multaj tiaj vortoj en Esperanto kreiĝis ekster Esperanto, kaj envenis en la lingvon kiel apartaj radikoj, ekz. *motelo* ("hotelo por aŭtoveturantoj") el la angla *motel* ("*motor*" + "*hotel*"). Tiaj kunfandoj estas senproblemaj, ĉar ili simple estas apartaj radikoj en Esperanto, ne kunmetaĵoj. Sed aliaj fakte kre-iĝis en Esperanto, ekz. **alies** (§13.3), kiu povas esti rigardata kiel neregula kunfando de *alia* kaj *ies*, **kompufono**° (telefono, kiu esence estas komput-ilo, "saĝtelefono") el *komput(il)o* + *telefono*, **kodumatono**° (intensa kun-labora programada evento, "kodumfesto") el *kodumado* (neordinara komputila programado) + *maratono*, **Breksiĝo**° (la eliro de Britujo el la Eŭropa Unio, "Briteliro") el *Britujo* + *eksiĝo*. Kelkaj tiaj kreaĵoj povas esti utilaj kaj akcepteblaj, sed oni principe rigardu ilin kiel apartajn novajn radikojn. Ĝenerale oni tamen evitu krei tiajn vortojn, ĉar baza principo de la vortfarado en Esperanto estas, ke ĉiu elemento de kunmetaĵo restu senŝanĝa (ne mallongigita aŭ aliformita). Se tia vorto estas intencita kiel ŝerco, ĝi kompreneble povas esti tute en ordo, se ja nur kiel ŝerco.

En karesaj nomoj faritaj per la sufiksoj ĈJ (§38.2.6) kaj NJ (§38.2.25) oni tamen ja mallongigas la antaŭan radikon.

# 38. Afiksoj

En tiu ĉi paragrafo estas klarigoj pri la **oficialaj afiksoj**, sed ekzistas ankaŭ neoficialaj afiksoj (§39).

## 38.1. Kio estas afikso?

Malgranda grupo de radikoj (ĉirkaŭ 40) nomiĝas **afiksoj**. Ili estas radikoj, kiujn oni uzas ĉefe en kunmetitaj vortoj. Kelkaj estas sufiksoj (§38.2) – postafiksoj. Ili aperas post aliaj radikoj. Aliaj estas prefiksoj (§38.3) – antaŭafiksoj. Ili aperas antaŭ aliaj radikoj.

Oni ne uzas unuecan principon por fari distingon inter afiksoj kaj ordinaraj radikoj. Precipe la tradicio decidis, kiuj radikoj nomiĝas afiksoj. Oni povus tamen diri, ke **afikso estas radiko, por kiu validas specialaj reguloj en la vortfarado**. Se radiko partoprenas en la vortfarado laŭ la ordinaraj reguloj por kombinoj kaj frazetvortoj, tiam ĝi estas ordinara radiko. Se radiko partoprenas en la vortfarado laŭ specialaj reguloj, tiam ĝi estas afikso. Iuj el la tradiciaj afiksoj estas laŭ tiu difino ordinaraj radikoj. En la ĉi-antaŭaj klarigoj de ordinara vortfarado (§37) estis pluraj ekzemploj kun radikoj, kiujn oni tradicie nomas afiksoj.

Plej multaj el la sufiksoj funkcias kiel ĉefelemento de kombino. Tio, kio staras antaŭ la sufikso, estas preciziga antaŭelemento. Sed por plej multaj sufiksoj ekzistas ia speciala regulo, kiu limigas la eblajn rilatojn inter la ĉefelemento kaj la antaŭelemento. Por ordinaraj radikoj ne ekzistas tiaj limigoj.

La sufiksoj AĈ, ĈJ, EG, ET, IN, NJ kaj UM tamen tute ne kondutas tiel. Vortoj faritaj per tiuj sufiksoj estas nek kombinoj nek frazetvortoj. Tiuj sufiksoj do estas veraj afiksoj.

Plej multaj el la prefiksoj funkcias kiel preciziga antaŭelemento de kombino. Tio, kio staras post la prefikso estas ĉefelemento, kies signifo iel preciziĝas per la prefikso. Sed ekzistas normale ia speciala regulo, kiu limigas la eblajn rilatojn inter la prefikso kaj la ĉefelemento.

La prefiksoj GE kaj MAL tamen ne kondutas tiel. GE kaj MAL tiom ŝanĝas la signifon de la posta elemento, ke oni ne povas klarigi tion kiel ordinaran kombinon (nek kiel frazetvorton). GE kaj MAL do estas veraj afiksoj.

La demando, kiuj el la tradiciaj afiksoj vere estas afiksoj, estas **teoria demando sen tre multe da praktika valoro**. El praktika vidpunkto sufiĉas scii la eventualajn specialajn regulojn, kiuj validas por la diversaj afiksoj.

Unu speciala principo tamen validas por ĉiu tradicia afikso. **Ĉe afikso oni normale ne uzas interligan finaĵon (§37.3)** – kiel en *dorm**o**ĉambro* kaj *mult**e**kosta*. Oni ne diras ekz. **ek**o**kuri**, **eks**o**sekretario**, **ŝip**o**estro**. Ĉe ordinaraj radikoj oni ĉiam povas uzi tian ligfinaĵon, eĉ kiam tio estas tute superflua. Ĉe afiksoj oni tion ne faras, eĉ kiam ligfinaĵo faciligus la elparolon. Ligfinaĵon oni uzas ĉe afikso nur kiam tio estas pli-malpli nepra por la signifo aŭ kompreno, ekz. *unu**a**eco*, *antaŭ**e**nigi*, *post**e**ulo*. Oni provis en kelkaj okazoj uzi nenormalan ligfinaĵon por montri, ke vorto ne obeas al ia

speciala afiksa regulo, ekz. *prez**o**inda* (§38.2.21). Tiaj provoj tamen ankoraŭ restas eksperimentoj, kiuj ne apartenas al la normala lingvo.

En la sekcioj pri sufiksoj (§38.2) kaj pri prefiksoj (§38.3) estas klarigoj de ĉiuj oficialaj afiksoj laŭ la tradicia klasado. Por ĉiu afikso ĝiaj eventualaj specialaj reguloj estas klarigitaj.

Aparte klarigitaj estas la participaj sufiksoj (§28.1) ANT, INT, ONT, AT, IT kaj OT. Legu ankaŭ pri afikseca uzo de ordinaraj radikoj, vortoj kaj kunmetaĵoj en §38.4, kaj pri neoficialaj afiksoj en §39.

*PMEG* sekvas tiun klasadon de la oficialaj prefiksoj kaj sufiksoj, kiu troviĝas en la *Baza Radikaro Oficiala* de la Akademio de Esperanto (*Aktoj de la Akademio II*, p. 28 – 54). Efektive la tradicia klasado varias en nur du okazoj: la prefikso ĈEF (§38.3.2), kiu iafoje estas klasata kiel ordinara radiko, kaj la ekkria vorteto *fi* (§38.4.3), kiu iafoje estas klasata kiel prefikso.

## 38.2. Sufiksoj

### 38.2.1. AĈ

AĈ = "malbona kvalito, sentaŭgeco, senvaloreco". AĈ ne ŝanĝas la bazan signifon de vorto, sed nur aldonas nuancon de malboneco. Komparu kun MIS (§38.3.8), kaj kun prefikseca *fi* (§38.4.3). (La sufikso AĈ estis oficialigita en 1909 en la *Unua Oficiala Aldono al Universala Vortaro*.)

- *domo* → *domaĉo* = malbona, kaduka, disfalanta domo
- *vesto* → *vestaĉo* = eluzita, malpura vesto
- *ĉevalo* → *ĉevalaĉo* = malbona, senvalora ĉevalo
- *babili* → *babilaĉi* = stulte, malice babili
- *fari* → *faraĉi* = malbone, senzorge fari
- *mola* → *molaĉa* = sen dezirata malmoleco aŭ streĉiteco

#### Ordinara radiko

- *aĉa* = malbonkvalita, sentaŭga, senvalora
- *Aĉ!* = ekkrio, kiu esprimas malkontentecon pri io malbona (legu pli pri tia ĉi uzo de nudaj radikoj en §18.2)

### 38.2.2. AD

AD = "daŭra ago". Tio, kio staras antaŭ AD, ĉiam ricevas agan kaj daŭrecan signifon. La aga signifo estas tiu, kiun la radiko havas kun verba finaĵo (§37.2.4).

#### Agaj radikoj

Se la radiko jam per si mem montras agon, la AD-formo montras, ke la ago daŭras longe aŭ okazas ofte:

- *uzo* → *uzado* = daŭra, regula uzo
- *iro* → *irado* = daŭra, longa iro

- *viziti* → *vizitadi* = ofte, regule viziti
- *esti* → *estadi* = daŭre, ripete esti

### Klariga AD

Se radiko havas plurajn signifojn, kaj unu el tiuj signifoj estas ago, la AD-formo montras nur (daŭran) agon, kaj estas uzebla por eviti miskomprenon. Se oni uzas verban finaĵon, miskompreno ne eblas, kaj AD servas nur por aldoni daŭran signifon. Se oni uzas ne-verban finaĵon, AD estas iafoje uzata ankaŭ kiam ne temas pri longa daŭro. AD tiam servas nur por atentigi pri la aga signifo:

- *konstruo* = la ago konstrui, konstrumaniero, io konstruita → *konstruado* = la ago (daŭre) konstrui
- *danco* = la ago danci, dancospeco → *dancado* = la ago (daŭre) danci
- *skribo* = la ago skribi, skribomaniero, io skribita, verko → *skribado* = la ago (daŭre) skribi

Komparu kun klariga AĴ (§38.2.3) kaj klariga EC (§38.2.8).

### Ne-agaj radikoj

Se la radiko ne montras agon, AD aldonas agan (daŭran) signifon. La aga signifo estas ĝuste tiu, kiun la radiko havas kun verba finaĵo:

- *martelo* (ilo) → *marteli* = bati per martelo → *martelado* = la ago (daŭre) marteli
- *broso* (ilo) → *brosi* = froti per broso → *brosado* = la ago (daŭre) brosi
- *reĝo* (persono) → *reĝi* = regi kiel reĝo → *reĝado* = la ago (daŭre) reĝi
- *krono* (aĵo) → *kroni* = surmeti kronon sur kapon → *kronado* = ceremonio por kroni reĝon
- *rapido* (eco) → *rapidi* = agi aŭ moviĝi rapide → *rapidado* = daŭra rapida ago aŭ moviĝo
- *malfruo* (eco) → *malfrui* = fari ion malfrue → *malfruado* = la ago (ofte) fari ion malfrue

Se la verba formo de radiko havas statan signifon (se ĝi signifas “esti tia”), oni malofte aldonas AD. Se oni tamen uzas AD, la AD-formo montras daŭran staton:

- *verdo* (koloro) → *verdi* = esti verda → *verdado* (malofta formo) = daŭra stato esti verda

Se oni volas montri, ke temas pri ago, sed ne deziras la daŭran signifon de AD, oni devas uzi alian agan radikon sen daŭra signifo, aŭ esprimi sin tute alie:

- *martelado* (daŭra) → *martelbato* = unu bato per martelo
- *brosado* (daŭra) → *brostiro* = unu frota tiro per broso
- *kronado* (daŭra) → *surmeto de krono* (nedaŭra)

### Malnova uzo

En la komenca tempo oni tre multe uzis AD en verboj por montri daŭran agon:

- *Li ne* ***zorgadis*** *pri siaj soldatoj, nek pri teatro kaj ĉaso, esceptinte nur se ili* ***donadis*** *al li okazon montri siajn novajn vestojn.* [FA1.107] Nun oni skribus simple *zorgis* kaj *donis*. Oni uzas *donadis*, *zorgadis* k.s., nur kiam oni volas aparte emfazi, ke temas pri daŭreco.

### Ordinara radiko

- *ade* = daŭre, longe
- *ad-vorto* = vorto kun aga signifo

Praktike oni tre malofte uzas AD kiel ordinaran radikon.

## 38.2.3. AĴ

AĴ = "(konkreta) afero". Plej ofte AĴ montras ion konkretan, sed tio ne estas nepra. En iuj vortoj temas pri afero abstrakta. Komparu kun EC (§38.2.8), kiu ĉiam montras ion abstraktan (kvaliton aŭ staton). La diferenco inter AĴ kaj EC tamen ne estas unuavice diferenco inter konkreto kaj abstrakto, sed inter afero kaj kvalito/stato.

### Ecaj radikoj

Plej ofte oni metas AĴ post radiko kun eca signifo (kiu normale estas A-vorto). La rezulta AĴ-vorto montras aferon karakterizatan de tiu eco:

- *bela* → *belaĵo* = (konkreta) afero aparte bela, konkretiĝo de belo
- *utila* → *utilaĵo* = (konkreta) afero, kiu estas utila
- *dolĉa* → *dolĉaĵo* = io karakterizata de dolĉa gusto (bombono k.s.)
- *nuda* → *nudaĵo* = nuda parto de io (ekz. de korpo)
- *nova* → *novaĵo* = afero ĵus aperinta, io ĵus okazinta

Multaj AĴ-vortoj havas specialan signifon. *Dolĉaĵo* ne estas iu ajn dolĉa afero, sed io aparte farita por gusti dolĉe. *Belaĵo* ne estas iu ajn bela aĵo, sed afero, kiu reprezentas belecon, aŭ kiu beligas ion.

### Agaj radikoj

Oni ankaŭ povas uzi AĴ ĉe aga radiko (kiu normale estas verbo). Tia AĴ-vorto montras (konkretan) aferon, kiu rilatas al la ago. La preciza signifo dependas de la speco de ago. Povas esti rezulto de la ago, konkretaĵo kiu faras la agon, konkretaĵo uzata por la ago, objekto de la ago k.t.p.:

- *fari* → *faraĵo* = io farita, farata aŭ farota
- *desegni* → *desegnaĵo* = desegnita bildo
- *draŝi* → *draŝaĵo* = draŝita greno
- *segi* → *segaĵo* = ligneretoj aŭ ligna polvo, kiuj ekestis pro segado
- *aparteni* → *apartenaĵo* = io, kio apartenas al iu
- *bruli* → *brulaĵo* = io, kio brulas

- *kreski* → *kreskaĵo* = io, kio kreskas, planto
- *kovri* → *kovraĵo* = io, per kio oni kovras
- *amuzi* → *amuzaĵo* = io, per kio oni povas sin amuzi
- *fini* → *finaĵo* = lingva elemento, per kiu oni finas vorton
- *akiri* → *akiraĵo* = io akirita
- *havi* → *havaĵo* = io havata
- *trinki* → *trinkaĵo* = io, kion oni trinkas
- *fandi* → *fandaĵo* = fandita substanco, objekto farita per fandado, drato kiu facile fandiĝas (speco de elektra sekurigilo)

Oni povas iafoje aldoni participan sufikson (§28.1) por plia precizeco: *draŝataĵo* (greno, kiun oni draŝas), *draŝitaĵo* (greno, kiun oni jam draŝis), *draŝotaĵo* (greno, kiun oni intencas draŝi), *brulantaĵo* (io, kio estas brulanta), *brulintaĵo* (io, kio jam brulis). Normale tamen simpla AĴ-vorto plene sufiĉas.

### Klariga AĴ

Se radiko havas plurajn signifojn, kaj se nur unu el tiuj estas konkretaĵo, tiam AĴ povas klarigi, ke temas nur pri la konkreta signifo. Komparu kun klariga AD (§38.2.2) kaj klariga EC (§38.2.8):

- *konstruo* = la ago konstrui, konstrumaniero, io konstruita → *konstruaĵo* = io konstruita (ordinare domo)
- *skribo* = la ago skribi, skribomaniero, io skribita, verko → *skribaĵo* = io skribita

### Alispecaj elementoj

Oni uzas AĴ ankaŭ post aliaj radikoj (ankaŭ radikoj kun konkreta signifo), post vortetoj kaj post frazetoj. Tiaj AĴ-vortoj montras ian (konkretan) aferon kun rilato al tio, kio staras antaŭ AĴ:

- *ligno* → *lignaĵo* = io farita el ligno
- *tolo* → *tolaĵo* = io farita el tolo
- *infano* → *infanaĵo* = infaneca afero
- *araneo* → *araneaĵo* = reto de araneo
- *azeno* → *azenaĵo* = azeneca (= stulta) afero
- *ĉirkaŭ* → *ĉirkaŭaĵo* = spaco/loko/regiono ĉirkaŭ io
- *sub* → *subaĵo* = io, kio troviĝas sub io alia, subŝtofo, skribsubaĵo, fono
- *post* → *postaĵo* = pugo
- *mi* → *miaĵo* = io, kio koncernas min, aŭ kio apartenas al mi
- *sen senco* → *sensencaĵo* = afero, al kiu mankas senco
- *granda animo* → *grandanimaĵo* = faraĵo karakterizata de ies granda (= nobla) animo

### Manĝaĵoj

Aparta grupo de AĴ-vortoj estas manĝaĵoj. Plej ofte tio, kio staras antaŭ AĴ, montras ion manĝeblan. La tuta vorto montras manĝaĵon preparitan el tio:

- *porko* → *porkaĵo* = manĝaĵo el porko
- *kokido* → *kokidaĵo* = manĝaĵo el kokido
- *ovo* → *ovaĵo* = manĝaĵo el ovo(j)
- *sukero* → *sukeraĵo* = frandaĵo el sukero
- *glacio* → *glaciaĵo* = dolĉaĵo el glacieca kremo

En aliaj tiaj vortoj la antaŭelemento ne estas io manĝebla:

- *pato* → *pataĵo* = manĝaĵo preparita en pato
- *baki* → *bakaĵo* = manĝaĵo preparita per bakado
- *bruna* → *brunaĵo* = manĝaĵo farita el faruno brunigita en butero

### Nombreblaj kaj nenombreblaj AĴ-vortoj

O-vortoj povas laŭsence esti nombreblaj aŭ nenombreblaj (§8.2.2). Ĉe O-vortoj kun AĴ-sufikso la nombrebleco ofte ne estas klare fiksita. Tial unu sama AĴ-vorto povas uziĝi jen kun nombrebla senco, jen kun nenombrebla:

- *Sur la ebena tero sub ni ne troviĝas multe da* ***vidindaĵo****.* [FA1.187] La vorto *vidindaĵo* uziĝas kun senco nenombrebla ("substanceca"). Ekzistas pli aŭ malpli multe da vidindaĵo.
- *En Eŭropo ekzistas multe da* ***vidindaĵoj****!* [FA3.55] La vorto *vidindaĵoj* uziĝas kun senco nombrebla. Ekzistas pli aŭ malpli multaj vidindaĵoj. Oni povus nombri ilin.
- *Kiam vi kolektos la* ***produktaĵon*** *de la tero, festu la feston de la Eternulo dum sep tagoj.* [Lv.23] Nenombrebla, substanceca produktaĵo.
- *Kaj la arbo de la kampo donados siajn fruktojn, kaj la tero donados siajn* ***produktaĵojn****.* [Jĥ.34] Nombreblaj produktaĵoj.

Se AĴ-vorto havas J-finaĵon, ĝi sendube havas sencon nombreblan, sed se mankas J-finaĵo, ambaŭ interpretoj estas eblaj: *Li lavis* ***tolaĵon****.* La tolaĵo povas esti unu (nombrebla) vestaĵo, tuko aŭ simile. Sed ankaŭ povas temi pri kolekto de diversaj vestaĵoj, tukoj k.t.p., kiujn oni rigardas kiel unu nenombreblan amason.

### Ordinara radiko

- *aĵo* = konkreta afero (de nedifinita speco)
- *aĵ-vorto* = vorto kiu montras aĵon, konkreta vorto

### 38.2.4. AN

AN = "membro de grupo, loĝanto de loko, adepto de doktrino, persono kiu apartenas al loko" k.s. Komparu kun IST (§38.2.24). Tio, kio staras antaŭ AN, ĉiam montras, al kio la ano apartenas:

- *klubo* → *klubano* = membro de klubo
- *familio* → *familiano* = membro de familio

- *Eŭropo → eŭropano* = loĝanto de Eŭropo
- *Brazilo → brazilano* = loĝanto/civitano de Brazilo
- *Francujo → francujano* = loĝanto/civitano de Francujo
- *vilaĝo → vilaĝano* = loĝanto de vilaĝo
- *kamparo → kamparano* = loĝanto de kamparo
- *kongreso → kongresano* = partoprenanto en kongreso
- *Kristo → kristano* = ano de Kristo, de la religio de Kristo.
- *Budho → budhano* = ano de Budho, de la ideoj de Budho.
- *Islamo → islamano* = kredanto je Islamo
- *respubliko → respublikano* = subtenanto de la ideo ke ŝtato estu respubliko, ano de partio kiu nomas sin respublika
- *ŝipo → ŝipano* = homo, kiu servas sur ŝipo
- *civito → civitano* = plenrajta membro de ŝtato
- *estraro → estrarano* = membro de estraro
- *UEA → UEA-ano* = membro de UEA (Universala Esperanto-Asocio)
- *alia domo → alidomano* = loĝanto de alia domo
- *sama lando → samlandano* = loĝanto de la sama lando
- *sama religio → samreligiano* = kredanto de la sama religio

### Ordinara radiko

- *ano* = membro de societo, partio, familio, eklezio k.s.
- *aniĝi* = fariĝi membro, aliĝi al grupo

### 38.2.5. AR

AR = "tuto aŭ kolekto de multaj samspecaj aferoj". Tio, kio staras antaŭ AR, ĉiam montras, el kiaj aferoj konsistas la tuto.

AR povas montri tuton de pluraj kunapartenantaj aferoj:

- *verko → verkaro* = ĉiuj verkoj de unu aŭtoro
- *estro → estraro* = elektita grupo de estroj de unu organizo
- *arbo → arbaro* = loko kun multaj kune kreskantaj arboj
- *haro → hararo* = ĉiuj haroj sur ies kapo
- *tendo → tendaro* = grupo de tendoj uzata kiel provizora loĝejo
- *ŝafo → ŝafaro* = ĉiuj ŝafoj de unu posedanto aŭ en unu loko
- *manĝilo → manĝilaro* = ĉiuj diversaj manĝiloj de unu hejmo, tablo aŭ posedanto
- *meblo → meblaro* = ĉiuj mebloj de unu unu ĉambro, apartamento aŭ domo
- *membro → membraro* = ĉiuj membroj de ekz. klubo
- *altaj montoj → altmontaro* = masivo aŭ ĉeno de altaj montoj

AR povas montri ion, kio konsistas ĉefe el pluraj samspecaj aferoj, sed ne nur el tio:

- *vorto → vortaro* = libro kun listo de vortoj kaj klarigoj pri ili
- *kanto → kantaro* = libro kun kolekto de kantoj
- *horo → horaro* = tabelo de horoj, en kiuj okazas io speciala
- *demando → demandaro* = listo de respondendaj demandoj
- *ŝtupeto → ŝtupetaro* = grimpilo el du stangoj kun multaj ŝtupetoj (= eskalo)
- *vagono → vagonaro* = vico de kunigitaj vagonoj tirata de lokomotivo (= trajno)

Iafoje AR montras ĉiujn en la mondo, aŭ ĉiujn en unu regiono:

- *homo → homaro* = ĉiuj homoj en la mondo, la tuta homa gento
- *gazeto → gazetaro* = ĉiuj gazetoj en unu regiono

### Ordinara radiko

- *aro* = grupo, kolekto, grego k.s.
- *arigi* = meti en grupon, kolekti
- *ara* = grupa
- *granda aro → grandare* = en granda aro

### 38.2.6. ĈJ

Per ĈJ oni faras karesajn nomojn de viroj. Komparu kun NJ (§38.2.25) kaj ET (§38.2.15). Antaŭ ĈJ oni uzas mallongigitan formon de la nomo. Kutime oni konservas ĉirkaŭ 1 ĝis 5 literojn:

- *Johano → Johanĉjo* [FE.38] aŭ *Joĉjo* [FE.38]
- *Nikolao → Nikolĉjo* [FE.38] aŭ *Nikoĉjo* [FE.38] aŭ *Nikĉjo* [FE.38] aŭ *Niĉjo* [FE.38]
- *Ernesto → Erneĉjo* [FE.38] aŭ *Erĉjo* [FE.38]
- *Vilhelmo → Vilhelĉjo* [FE.38] aŭ *Vilheĉjo* [FE.38] aŭ *Vilĉjo* [FE.38] aŭ *Viĉjo* [FE.38]
- *papago → Papĉjo* [FA1.138] (karesa nomo de vira papago)
- *patro → paĉjo* [FA2.16] aŭ *Paĉjo*
- *onklo → Oĉjo*
- *frato → Fraĉjo*

ĈJ, same kiel NJ (§38.2.25), estas iom aparta sufikso, ĉar ĝi ne komenciĝas per vokalo, kaj ĉar oni povas mallongigi la radikon antaŭ ĝi. Iafoje oni eble povus unue aldoni la sufikson UL (§38.2.30), se tio helpus krei pli bonsonan formon: *Petro → Petrulo → Petruĉjo* k.s. Tio tamen ne estas tradicia, nek eble tute logika, sed kiam temas pri karesnomoj, nek tradicio, nek logiko, nek rigora gramatiko, estas tre gravaj. Karesnomojn oni fakte povas krei tute laŭplaĉe (ekz. per pruntado el aliaj lingvoj). Iafoje, se la baza vorto estas tre mallonga, oni povas aldoni ĈJ post tiu tuta vorto, eĉ konservante eventualan O-finaĵon antaŭ ĈJ: *avo → avoĉjo* (anstataŭ la iom malfacile elparoleblaj kaj apenaŭ rekoneblaj formoj *avĉjo* kaj *aĉjo*).

Legu ankaŭ pri la proponita virseksa sufikso IĈ° en §39.1.13, la proponita neduuma sufikso IP° (§39.1.18) kaj la proponitaj karesnomaj sufiksoj J° kaj PJ° (§39.1.23).

### 38.2.7. EBL

EBL = "povas esti farata". Komparu kun IND (§38.2.21) kaj END (§38.2.12). Tio, kio staras antaŭ EBL, ĉiam ricevas agan kaj pasivan signifon. La aga signifo estas tiu, kiun la radiko havas kun verba finaĵo (§37.2.4). EBL-vortoj do ĉiam devenas de verboj. Oni povas uzi EBL nur ĉe objektaj verboj:

- *manĝi* → *manĝebla* = tia, ke ĝi povas esti manĝata
- *nombri* → *nombrebla* = tia, ke ĝi povas esti nombrata
- *marteli* → *martelebla* = tia, ke ĝi povas esti martelata
- *malhavi* → *malhavebla* = tia, ke oni povas ĝin malhavi, nenecesa → *nemalhavebla* = tia, ke oni ne povas ĝin malhavi, necesa
- *legi* → *legeble* = tiel, ke la rezulto povas esti legata
- *kompreni* → *kompreneble* = tiel, ke ĉiu ajn povas kompreni, memklare, memevidente (ofte uzata kiel mallongigo de *memkompreneble*)
- *esperi* → *espereble* = tiel, ke oni povas esperi la aferon
- *supozi* → *supozeble* = tiel, ke oni povas supozi la aferon
- *nei* → *neebla* = tia, ke oni povas nei ĝin (*neebla* tamen estas dusignifa vorto, §22.4)

Oni iafoje uzas EBL (kaj ankaŭ IND §38.2.21 kaj END §38.2.12) post verbo, kiu normale estas senobjekta, sed kiu tamen iafoje havas objekton:

- *iri* → *irebla* = tia, ke ĝi povas esti irata, tia, ke oni povas iri ĝin (= iri sur aŭ laŭ ĝi)
- *loĝi* → *loĝebla* = tia, ke ĝi povas esti loĝata, tia, ke oni povas loĝi ĝin (= loĝi en ĝi)

Normale oni diras *iri sur/laŭ vojo* kaj *loĝi en domo*, sed ankaŭ *iri vojon* kaj *loĝi domon* estas laŭregulaj, kvankam tre maloftaj. Sekve oni iafoje uzas ankaŭ pasivajn participojn kun tiaj verboj (§28.1).

#### Ordinara radiko

- *ebligi* = igi ebla
- *eblo* = io, kio estas ebla
- *ebleco* = eco de io, kio estas ebla (vidu ankaŭ ĉe EC, §38.2.8)
- *eble* = "povas esti"
- *ebla* = povanta esti, povanta okazi
- *neebla* = nepovanta esti, nepovanta okazi

*Neebla* havas du malsamajn signifojn. Se oni uzas EBL ĉe la verbo *nei*, oni kreas *neebla* = “tia, ke oni povas nei ĝin”. Se oni metas *ne* antaŭ la A-vorto *ebla*, oni kreas *neebla* = “nepovanta esti”. Por povi eviti miskomprenon oni proponis la verbon *negi* (= *nei*), el kiu oni povus fari la vorton *negebla*, kiu havus nur la signifon “tia, ke oni povas ĝin nei”. Kaj *negi*, kaj *negebla* estas tamen tre maloftaj, kaj malmultaj ilin komprenas. Anstataŭ la alia *neebla* oni povas uzi *malebla*:

- *ireblo* = irebleco, eblo iri

La vorto *ireblo* estas dusignifa. Kiam ĝi signifas “irebleco”, “tio, ke estas eble iri ion” (malofte uzebla signifo), oni regule donis pasivan signifon al la ago IR, kaj EBL do estas uzata kiel sufikso laŭ siaj normalaj reguloj. Sed kiam *ireblo* signifas “eblo iri” (“okazo iri”), oni uzis EBL kiel ordinaran radikon: “eblo” + preciziga antaŭelemento IR. Povas en tia okazo esti inde iel montri, ke oni uzis EBL kiel ordinaran radikon. Oni povus meti ligfinaĵon, kion oni normale ne faras ĉe afikso: *ir**o**eblo*. Tia eksperimenta uzo estas tamen malofta. Pli normala maniero estas skribi kun dividostreko: *ir-eblo*. Elparole oni tiam normale uzas kromakcenton (§2.2) je IR.

### 38.2.8. EC

EC = “kvalito aŭ stato (de iu aŭ io)”. EC ĉiam montras ion abstraktan (kvaliton aŭ staton). Komparu kun AĴ (§38.2.3), kiu normale montras ion konkretan.

#### Ecaj radikoj

EC povas aperi post radiko, kiu mem havas ecan signifon. Tiam la formo sen EC povas montri pli sendependan (abstraktan) ideon, dum la EC-formo ĉiam montras kvaliton de iu aŭ io, staton de iu aŭ io:

- *bono* = la abstrakta ideo bono → *boneco* = bono kiel kvalito de io aŭ iu

  *Vi estos kiel Dio, vi scios **bonon** kaj malbonon.* Gn.3

  *Ili admiris la **bonecon** de lia ago.*

- *ruĝo* = la koloro ruĝo → *ruĝeco* = la stato esti ruĝa

  *Ŝiaj blankaj vangoj estis kolorigitaj de freŝa **ruĝo**.* M.150

  *La **ruĝeco** de ŝiaj vangoj malkaŝis ŝiajn sentojn.*

- *neceso* = absoluta bezono → *neceseco* = la stato esti necesa

  *En okazo de **neceso** vi povos tranokti ĉe mi.*

  *Ĝia **neceseco** fariĝados por ili kun ĉiu tago ĉiam pli sentebla.* FK.266

#### Klariga EC

Ĉe plursignifaj radikoj EC povas klarigi, ke temas ĝuste pri eco. Komparu kun klariga AD (§38.2.2) kaj klariga AĴ (§38.2.3):

- *belo* = abstrakta ideo pri belo, bela afero aŭ belo kiel kvalito de io → *beleco* = belo kiel kvalito de iu aŭ io
- *proksimo* = stato troviĝi proksime, proksima loko → *proksimeco* = stato troviĝi proksime

Iafoje oni tamen uzas ĉi tian EC-vorton ankaŭ kie simpla O-vorto estus pli logika: *Ĉu vi aŭdis nenian tumulton en la **proksimeco*** [= proksimaj lokoj]*?* Rt.123

## Mezuroj

Kelkaj simplaj O-vortoj montras ian mezuron kiel neŭtralan ideon. Se oni aldonas EC al tia vorto, temas pri multeco de la mezuro:

- *longo* = horizontala dimensio (ĉiu konkretaĵo havas ian longon) → *longeco* = la eco esti longa, havi multe da longo

  *Ni mezuris la **longon** de ĝiaj kruroj, kaj trovis, ke ili estas tre mallongaj.*

  *La **longeco** de ĝiaj kruroj tre surprizis nin.* La kruroj estis surprize longaj.

- *alto* = vertikala dimensio (ĉiu konkretaĵo havas ian alton) → *alteco* = la eco esti alta, havi multe da alto

  *Ĝi* [= la altaro] *estu kvarangula; kaj du ulnoj estu ĝia **alto**.* Er.30

  *Ĝi estis bone videbla pro sia **alteco**.* Jĥ.19

- *rapido* = mezuro de distanco irata en certa tempo (ĉiu moviĝanta afero havas ian rapidon) → *rapideco* = eco de io, kio iras (tre) rapide

  *La **rapido** de la aŭto estis nur 20 kilometroj en horo.*

  *La aviadilo pasis kun fulma **rapideco**.*

Iafoje estas malfacile fari tiun ĉi distingon inter neŭtrala O-vorto kaj multeca EC-formo. Ofte oni ignoras la diferencon, kaj uzas EC ankaŭ kie ĝi ne estas bezonata: *La **denseco*** [= denso] *de gaso estas la rilato de ĝia maso al ĝia volumeno.*

Iuj volas, ke oni ĉiam rigore distingu, sed tio estas necesa nur kiam estas efektiva risko de miskompreno. En scienca lingvaĵo la distingo ofte tre gravas.

Rimarku, ke multaj similaj O-vortoj tute ne havas ĉi tian neŭtralan mezursignifon. *Proksimo* = *proksimeco* aŭ *proksima loko*. Por neŭtrala mezuro oni uzas *distanco*. *Juno* (apenaŭ uzata) egalas al *juneco*. Neŭtrala mezurvorto estas *aĝo*.

Rimarku ankaŭ, ke oni normale ne uzas vortojn kiel **mallongo**, **malalto** kaj **malrapido** (krom eble ŝerce). Neŭtralaj estas nur *longo*, *alto* kaj *rapido*. Neneŭtralaj estas *longeco*, *mallongeco*, *alteco*, *malalteco*, *rapideco* kaj *malrapideco*.

## Mallogikaj EC-formoj

Iafoje EC estas uzata mallogike pro influo de naciaj lingvoj:

- **Bedaŭrinde mi ne havas la **eblecon** tion ĉi fari.** Tute ne temas pri eco, sed pri io, kio estas ebla. Oni uzu *eblo* aŭ *eblaĵo*: *Bedaŭrinde mi ne havas la **eblon** tion ĉi fari.* Ll.339 Se oni hezitas inter *eblo* kaj *ebleco*, oni elektu *eblo*, ĉar ĝi estas resuma formo kaj por *ebleco*, kaj por *eblaĵo*.

- *Laboro mensa kaj artista ne prezentas ja la tutan amplekson de la **aktiveco** de homo.* [M.77] Ne temas pri eco, sed pri agado. Logike oni uzu *aktivado* aŭ eventuale *aktivo*. La formo *aktiveco* fariĝis tamen tre ofta en tiaj ĉi frazoj, kaj oni verŝajne devas toleri ĝin.

### Alispecaj radikoj

Ĉe io, kio ne mem montras econ aŭ kvaliton, EC aldonas tian signifon. En tia okazo la simpla O-formo havas tute alian signifon ol la EC-formo:

- *homo* → *homeco* = natura kvalito de homo
- *heroo* → *heroeco* = la eco esti heroo, konduti kiel heroo
- *fianĉo* → *fianĉeco* = la stato esti fianĉo
- *episkopo* → *episkopeco* = la stato/ofico esti episkopo
- *granda animo* → *grandanimeco* = la eco havi grandan (= noblan) animon
- *ŝtono* → *ŝtoneco* = la eco esti malmola kiel ŝtono
- *vivo* → *viveco* = la eco esti plena je vivo
- *unu* → *unueco* = la eco esti kiel unu
- *unua* → *unuaeco* = la eco esti la unua

### EC por tempo

Post participoj, kaj en kelkaj aliaj vortoj, EC montras tempon aŭ aĝon:

- *estonta* → *estonteco* = estonta tempo
- *pasinta* → *pasinteco* = pasinta tempo
- *infano* → *infaneco* = eco esti infana, infanaĝo
- *juna* → *juneco* = eco esti juna, junaĝo

Formoj kiel *estonto* kaj *pasinto* normale montras personon, kiel ĉiuj participoj kun O-finaĵo (§28.3), sed iafoje oni uzas *estonto* kaj *pasinto* kiel mallongigojn de *estonteco* kaj *pasinteco*.

### *Eca, ece*

EC ankaŭ povas esti uzata kun A-finaĵo aŭ E-finaĵo (aŭ verba finaĵo). Tiaj formoj havas normale la signifon "simila, simile, samaspekta kiel, samamaniere kiel":

- ***silkecaj** ŝtrumpoj* = ŝtrumpoj silkosimilaj (silke molaj), sed ne nepre el silko
- ***ligneca** papero* = papero parte aspektanta kiel ligno
- ***ŝtoneca** koro* = koro tiel malmola (= sensenta), ke ĝi similas al ŝtono
- *Ni havas **amikecajn** rilatojn kun ili. = Ni rilatas kvazaŭ ni estus amikoj.*
- *Li diris tion per **supereca** tono. = Li diris tion per tono kvazaŭ li estus supera.*
- *Ĉesu konduti tiel **infanece**! = Ĉesu konduti en maniero tipa por infano.*

- *Kvankam ŝi estas knabino, ŝi ofte kondutas* ***virece****. = ... kondutas kiel viro.*
- *Tiu esprimo estas tro* ***franceca****. = ... estas simila al la franca lingvo.*

Iafoje oni povas por klareco uzi anstataŭe kunmetaĵojn kun *ŝajna*, *simila*, *maniera* aŭ *stila*. Vidu ankaŭ ESK (§39.1.11).

Iafoje formoj kun *...eca* signifas "rilata al tia eco, pri tia eco":

- ***patreca*** *testo* = testo pri patreco, testo por eltrovi, ĉu iu estas la patro
- ***reĝeca*** *edikto* = edikto pri reĝeco, edikto ke iu estas reĝo

### Ordinara radiko

- *eco* = kvalito
- *ecigi* = karakterizi
- *ec-vorto* = vorto, kiu montras econ

## 38.2.9. EG

EG = "(plej/tre) alta grado, (plej/tre) granda speco". Komparu kun ET (§38.2.15). EG ne ŝanĝas la bazan signifon de vorto, sed nur pligrandigas la signifon:

- *domo* → *domego* = (tre) granda domo
- *doloro* → *dolorego* = (tre) forta doloro
- *varma* → *varmega* = tre varma
- *longa* → *longega* = tre longa
- *bone* → *bonege* = tre bone
- *krii* → *kriegi* = (tre) laŭte krii
- *fali* → *falegi* = subite, forte fali
- *ŝati* → *ŝategi* = tre ŝati
- *dankon!* → *dankegon!* = grandan dankon!
- *tre* → *treege* = tre tre

Ofte EG-vorto havas specialan signifon:

- *pordo* → *pordego* = ĉefa pordo de domo, urbo, bieno, korto k.s.
- *brulo* → *brulego* = granda katastrofa brulo (de ekz. konstruaĵo)
- *granda* → *grandega* = eksterordinare granda

### Alternativoj de EG-vortoj

Kelkaj specialsignifaj EG-vortoj ricevis nekunmetitan alternativon. En iaj okazoj la alternativo fariĝis pli populara. En tiaj okazoj la EG-vorto tendencas perdi la specialan signifon:

- *pafilego* = artileria pafilo → *kanono*
- *kuraĝega* = kuraĝe riskema → *aŭdaca*
- *buŝego* = minaca buŝkavo de rabobesto → *faŭko*
- *ungego* = granda akra ungo de besto → *krifo*

### Malŝato

Iafoje EG montras nuancon de malŝato:

- *piedo* → *piedego* = granda, dika, malagrabla aŭ danĝera piedo de homo aŭ besto
- *manĝi* → *manĝegi* = avide aŭ troe manĝi, vori

### Ordinara radiko

- *ega* = fortega, intensega, ekstrema
- *ege* = fortege, intensege, ekstreme

## 38.2.10. EJ

EJ = "loko, spaco, domo, ĉambro k.s. destinita por io". Komparu kun UJ (§38.2.29) kaj ING (§38.2.22). Tio, kio staras antaŭ EJ, ĉiam estas tio, kio okazas aŭ troviĝas en la loko.

### Agejoj

EJ povas montri lokon, kiu ekzistas speciale por certa agado:

- *lerni* → *lernejo* = loko destinita por lernado
- *promeni* → *promenejo* = loko aranĝita por promenado
- *dormi* → *dormejo* = ĉambro por dormado
- *eliri* → *elirejo* = loko (normale pordo), tra kiu oni povas eliri
- *redakti* → *redaktejo* = loko, kie oni redaktas (ekz. gazeton)
- *akcepti* → *akceptejo* = loko, kie oni estas akceptata (en hotelo, kongreso k.s.)
- *kongreso* → *kongresejo* = loko, kie okazas kongreso
- *necesa* → *necesejo* = loko por certa necesa agado, kiun oni preferas ne rekte diri (nome urinado kaj fekado)
- *preĝi* → *preĝejo* = loko por preĝado kaj aliaj religiaj agadoj
- *urĝi* → *urĝejo* = malsanulejo (aŭ parto de malsanulejo), kie oni urĝe traktas akcidentoviktimojn k.s.

La vorto *preĝejo* estas tradicie uzata precipe por kristana preĝejo, dum oni preferas specialajn vortojn por preĝejoj de aliaj religioj: *moskeo*, *sinagogo*, *templo* k.a. Sed *preĝejo* ja povas esti uzata por ĉia religio. Por kristana preĝejo ekzistas ankaŭ la speciala vorto *kirko* (tre malofte uzata). Plej simple oni tamen precizigas per: *kristana preĝejo*, *islama preĝejo*, *hinduisma preĝejo* k.t.p.

### Tenejoj, vendejoj

EJ povas montri lokon, kie oni tenas aŭ vendas ion:

- *trezoro* → *trezorejo* = loko, kie trezoro estas tenata
- *ĉevalo* → *ĉevalejo* = loko (domo) por ĉevaloj
- *aŭto* → *aŭtejo* = loko por teni aŭ prizorgi aŭtojn

- *mallibero* → *malliberejo* = loko de mallibero, por malliberuloj (= prizono)
- *cigaro* → *cigarejo* = magazeno en kiu oni vendas cigarojn, ĉambro en kiu oni tenas cigarojn
- *ĉapelo* → *ĉapelejo* = vendejo aŭ tenejo de ĉapeloj
- *viando* → *viandejo* = vendejo aŭ tenejo de viando
- *libro* → *librejo* = vendejo de libroj (kolekto aŭ kolektejo de libroj estas *biblioteko*)

Je bezono oni povas precizigi: *cigartenejo*, *cigarvendejo*, *ĉapeltenejo*, *ĉapelvendejo*, *librovendejo* k.t.p.

### Produktadejoj

Post nomo de kultivata planto EJ montras lokon de kultivado:

- *rizo* → *rizejo* = loko (kampoj), kie oni kultivas rizon
- *oranĝo* → *oranĝejo* = loko, kie oni kultivas oranĝarbojn
- *tabako* → *tabakejo* = loko, kie oni kultivas tabakon
- *vito* → *vitejo* = ĝardeno de vitoj, vinberĝardeno

Se temas pri fabriko aŭ simile, oni prefere uzu pli klarajn kunmetaĵojn: *tabakfarejo* = "loko, kie oni produktas cigaredojn kaj aliajn tabakaĵojn", *ŝtalejo* aŭ *ŝtalfabriko* = "fabriko de ŝtalo", *gisejo* aŭ *gisfabriko* = "fabriko de gisoj kaj gisaĵoj".

### Naturaj abundejoj

Iafoje EJ montras lokon en la naturo, kie abundas io:

- *herbo* → *herbejo* = loko, kie kreskas precipe herboj (ne arboj k.t.p.)
- *sablo* → *sablejo* = loko, kie abundas sablo
- *glacio* → *glaciejo* = loko kun konstanta glaciamaso (≈ glaĉero)

### Loko por persono aŭ grupo

EJ povas montri lokon, kie certa persono, grupo aŭ speco de personoj laboras, agas, vivas aŭ simile:

- *tajloro* → *tajlorejo* = loko, kie tajloro laboras
- *ŝuisto* → *ŝuistejo* = loko, kie ŝuisto laboras
- *episkopo* → *episkopejo* = palaco de episkopo
- *ministro* → *ministrejo* = loko (domo, oficejo) de ministro
- *konsulo* → *konsulejo* = loko, kie servas konsulo
- *stabo* → *stabejo* = loko, kie laboras stabo
- *virino* → *virinejo* = loĝloko por virinoj, haremo, bordelo
- *malsanulo* → *malsanulejo* = loko, kie oni flegas kaj kuracas malsanulojn (= hospitalo)

### Figura uzo

EJ-vorto, kiu montras ian oficejon aŭ laborejon, povas ankaŭ esti uzata figure por la personaro, kiu laboras tie:

- *La tuta **redaktejo** klopodis por fini la gazeton ĝustatempe.* Efektive ne la ejo mem klopodis, sed la ĵurnalistoj kaj aliaj laborantoj tie.
- *La **ministrejo*** [= ministerio] *pri financoj hieraŭ informis, ke ...*
- *Ĉu la **konsulejo** donis al vi vizon?*

### Ordinara radiko

- *ejo* = loko (destinita por ia speciala afero)
- *subtegmentejo* = subtegmento (§37.4) (ĉambro aŭ loko sub la tegmento)
- *subterejo* = subtero (loko sub la tero)
- *interkluzejo* = parto de kanalo inter du kluzoj

La vortoj *subtegmentejo*, *subterejo* kaj *interkluzejo* ne sekvas la ordinaran regulon, ke tio, kio aperas antaŭ EJ estu io, por kio la koncerna loko estas destinita, aŭ io, kion oni tenas en tiu loko, k.s. Sekve EJ ne estas uzata kiel sufikso en tiuj vortoj, sed kiel ordinara radiko. Pli tradiciaj estas la formoj *subtegemento* kaj *subtero*, kiuj estas okazoj de frazetvortigo per O-finaĵo (§37.4).

## 38.2.11. EM

EM = "inklino al io". La radiko antaŭ EM normale ricevas agan signifon. La aga signifo estas tiu, kiun la radiko havas kun verba finaĵo (§37.2.4). EM-vortoj do normale devenas de verboj.

### Natura tendenco

EM-vorto plej ofte montras, ke io pro sia naturo ofte aŭ daŭre tendencas al la ago:

- *mensogi* → *mensogema* = inklina al mensogado, ofte mensoganta
- *timi* → *timema* = inklina al timado, ofte timanta
- *manĝi* → *manĝema* = inklina al ofta aŭ multa manĝado
- *kompreni* → *komprenema* = tia, ke oni ĉiam volas kompreni
- *servi* → *servema* = tia, ke oni ofte volas servi al aliaj
- *venĝi* → *venĝema* = tia, ke oni volas venĝi, nepardonema
- *pura* → *puri* = esti pura → *purema* = tia, ke oni volas esti pura
- *dogmo* → *dogmi* = prezenti siajn opiniojn kiel dogmojn → *dogmema* = inklina al dogmado

### Momenta emo

Iafoje oni uzas EM por momenta aŭ okaza deziro, aŭ por pasanta bezono:

- *Ŝi sentis fortan **manĝemon**.* (= *... fortan malsaton.*)
- *Ĉu vi estas **trinkema**?* (= *... soifa?*)

- *Subite li fariĝis terure* ***dormema****.* (= *... terure dorme laca.*)
- *Ili deziris satigi sian* ***venĝemon****.* (= *Ili volis venĝi iun ofendaĵon.*)

Oni povas alternative uzi kunmetaĵojn kun *vola* (§38.4.1): *manĝivola*, *venĝovola*. Sed normale EM sufiĉas.

### Kapablo

En kelkaj vortoj EM montras kapablon:

- *produkti* → *produktema* = tia, ke oni povas multe produkti
- *krei* → *kreema* = tia, ke oni povas multe krei
- *decidi* → *decidema* = kapabla fari decidojn
- *inventi* → *inventema* = kapabla fari inventojn
- *eksplodi* → *eksplodema* = kapabla facile eksplodi (ekz. *eksplodema ĥemiaĵo*)
- *floro* → *flori* → *florema* = kapabla multe flori

Oni ankaŭ povas uzi kunmetaĵojn kun *pova* aŭ *kapabla* (§38.4.1): *decidpova*, *inventokapabla*. Vidu ankaŭ IV (§39.1.21). Normale tamen EM estas sufiĉe klara.

### Natura minaco, kontraŭvola risko

En iuj vortoj EM signifas, ke oni pro sia naturo estas minacata de io, ke oni riskas ion, kion oni ne volas:

- *erari* → *erarema* = tia, ke oni ofte aŭ facile faras erarojn
- *rompiĝi* → *rompiĝema* = tia, ke ĝi facile rompiĝas
- *vomi* → *vomema* = tiel malsana, ke oni eble vomos
- *morti* → *mortema* = tia, ke oni povas, eĉ devas, morti

### Ne-agaj radikoj

Iafoje oni faras EM-vorton, kiu ne devenas de verbo:

- *gasto* → *gastema* = tia, ke oni ŝatas gastojn
- *muziko* → *muzikema* = tia, ke oni ŝatas muzikon
- *vero* → *verema* = tia, ke oni ŝatas veron
- *la sama sekso* → *samseksema* = tia, ke oni preferas la propran sekson

EM-vortoj normale estas faritaj el verboj, kaj *gastema* tial povas kompreniĝi kiel “ema mem gasti”, *muzikema* kiel “ema mem muziki” k.t.p. Se ne temas pri tia signifo, povas esti preferinde uzi kunmetaĵojn kun *ama*: *gastama* = “tia, ke oni amas gastojn”, *muzikama* = “tia, ke oni amas muzikon”, *samseksama* = “tia, ke oni amas la propran sekson”. Aliflanke, kiam AM ŝajnas tro forta aŭ sence maltrafa, eble tamen EM estas preferinda.

### O-finaĵo

EM-vortoj havas plej ofte A-finaĵon, sed povas havi ĉian ajn finaĵon. Ĉe O-finaĵo oni antaŭe kutimis ĉiam aldoni la sufikson EC: *manĝemeco*, *timemeco* k.s. Sed EC normale ne estas bezonata. Sufiĉas *manĝemo*, *timemo* k.t.p.

### Forlaso de EM

Antaŭ la sufikso UL oni povas ofte forlasi EM, se la signifo restas klara:

- *timemulo → timulo*
- *drinkemulo → drinkulo*

### Ordinara radiko

Kiel ordinara radiko EM normale montras nedaŭran, momentan inklinon:

- *ema* = momente inklina
- *emo* = momenta inklino
- *emi* = havi momentan inklinon
- *malemo* = malinklino momenta
- *emigi* = krei momentan inklinon ĉe iu

### 38.2.12. END

END = "devas esti farata". Komparu kun EBL (§38.2.7) kaj IND (§38.2.21). Tio, kio staras antaŭ END, ĉiam ricevas agan kaj pasivan signifon. La aga signifo estas tiu, kiun la radiko havas kun verba finaĵo (§37.2.4). END-vortoj do ĉiam devenas de verboj. Oni povas uzi END nur ĉe objektaj verboj. END estas sufiĉe malofte uzata. (La sufikso END estis oficialigita en 1953.)

- *pagi → pagenda* = tia, ke ĝi devas esti pagata, tia, ke oni pagu ĝin
- *respondi → respondenda* = tia, ke ĝi devas esti respondata, tia, ke oni respondu ĝin

### Ordinara radiko

- *enda* = nepra, necesa, kiu devas esti, kiu devas okazi
- *ende* = nepre, necese
- *Endas, ke vi venu.* = Estas necese, ke vi venu.

END estas tre malofta afikso, kaj kiel ordinara radiko ĝi estas eĉ pli malofta. Tial oni atentu, ke vortoj kiel *enda*, *ende* kaj *endi* ne ĉiam kompreniĝas facile, kvankam ili estas tute regulaj.

### 38.2.13. ER

ER = "tre malgranda parto de tutaĵo". ER estas uzata, kiam io konsistas el multaj samspecaj partetoj. Tio, kio staras antaŭ ER, ĉiam montras la tuton, kiun la partetoj konsistigas:

- *sablo → sablero* = grajno de sablo
- *neĝo → neĝero* = flok(et)o el neĝo
- *ĉeno → ĉenero* = unu kunliga parto (ringo) de ĉeno
- *pluvo → pluvero* = akvoguto de pluvo
- *mono → monero* = peco de metala mono (papera monpeco nomiĝas *monbileto* aŭ *monpapero*)

- *herbo → herbero* = unu tigo de herbo
- *fajro → fajrero* = tre malgranda (fluganta) brulanta parto (elektran fajreron oni nomas ankaŭ *sparko*)
- *kudri → kudrero* = unu kompleta tratiro per kudrilo kaj fadeno

### Ordinara radiko

- *ero* = malgranda (konsistiga) parto
- *ereto* = malgrandega ero
- *grandaj eroj → grandera* = konsistanta el grandaj eroj
- *disaj eroj → diseriĝi* = dispartiĝi en multajn disajn erojn

### ER, PART kaj PEC

ER montras unu el multaj similaj apenaŭ distingeblaj konsistigaj partoj de tuto. Se temas pri diversspecaj aŭ individuecaj partoj, oni ne uzu ER, sed PART: *mondoparto* (≈ *kontinento*), *landparto*, *korpoparto*, *parto de libro*. Se temas pri parto, kiu estas derompita aŭ deŝirita de tuto, oni uzu PEC: *Mi disŝiris la leteron kaj disĵetis ĝiajn* ***pecetojn*** *en ĉiujn angulojn de la ĉambro.* [FE.42] (PEC havas ankaŭ diversajn aliajn signifojn.)

### 38.2.14. ESTR

ESTR = "persono kiu gvidas kaj decidas, mastro". Komparu kun ĈEF (§38.3.2). Tio, kio staras antaŭ ESTR, ĉiam estas la loko, kie la estro decidas, aŭ tio, pri kio la estro decidas:

- *ŝipo → ŝipestro* = tiu, kiu decidas sur ŝipo
- *banko → bankestro* = tiu, kiu decidas en banko
- *imperio → imperiestro* = titolo de gvidanto de imperio
- *provinco → provincestro* = gvidanto de provinco
- *grupo → grupestro* = gvidanto de grupo
- *urbo → urbestro* = persono elektita por gvidi kaj administri urbon
- *orkestro → orkestrestro* = persono, kiu gvidas orkestron
- *lernejo → lernejestro* = direktisto de lernejo
- *laboro → laborestro* = persono, kiu gvidas laboron, labormastro
- *cent → centestro* = oficiro super cento da soldatoj

### Ordinara radiko

- *estro* = ĉefo kun decida povo
- *estraro* = grupo de personoj, kiuj kune gvidas organizon
- *estrarano* = ano de estraro
- *estri* = esti estro super io, regi kiel estro
- *subestro* = persono, kiu helpas al estro

### 38.2.15. ET

ET = “(plej/tre) malalta grado, (plej/tre) malgranda speco”. Komparu kun EG (§38.2.9). ET ne ŝanĝas la bazan signifon de vorto, sed nur malgrandigas la signifon:

- *domo* → *dometo* = (tre) malgranda domo
- *doloro* → *doloreto* = (tre) malforta doloro, irito
- *varma* → *varmeta* = nur iom varma
- *verda* → *verdeta* = malforte verda, neklare verda
- *dika* → *diketa* = nur iom dika
- *babili* → *babileti* = babili malmulte
- *pluvi* → *pluveti* = pluvi malforte, pluvi kun malgrandaj gutoj
- *iom* → *iomete* = nur malmulte

Ofte ET-vorto montras specialan signifon:

- *ŝtrumpo* → *ŝtrumpeto* = mallonga ŝtrumpo, kiu kovras nur la piedon kaj la parton tuj super la piedo
- *ridi* → *rideti* = ridi sensone kun fermita buŝo
- *manĝi* → *manĝeti* = malmulte kaj senapetite manĝi
- *rafano* → *rafaneto* = speciala malgranda varianto de rafano (speco de legomo)

#### Alternativoj de ET-vortoj

Kelkaj specialsignifaj ET-vortoj ricevis nekunmetitan alternativon. En iaj okazoj la alternativo fariĝis pli populara. En tiaj okazoj la ET-vorto tendencas perdi la specialan signifon:

- *faleti* = preskaŭ fali pro mispaŝo → *stumbli*
- *vojeto* = tervojeto en arbaro aŭ kampo → *pado*
- *beleta* = plaĉaspekta → *linda*

#### Karesa signifo

Iafoje ET montras karesan nuancon:

- *patro* → *patreto* = kara patro, paĉjo
- *edzo* → *edzeto* = kara edzo
- *mano* → *maneto* = ĉarme malgranda mano
- *knabino* → *knabineto* = ĉarme malgranda knabino

#### Ordinara radiko

- *eta* = malgranda, malintensa
- *etigi* = fari malgranda
- *etiĝi* = fariĝi malgranda
- *etulo* = malgranda persono

Iafoje oni uzas ET prefiksece por montri specialan signifon:

- *burĝo* → *etburĝo* = burĝo, kies burĝeco estas eta (laŭ socia statuso)
- *fingro* → *etfingro* = speco de fingro, kiu estas kutime pli malgranda ol la aliaj fingroj sur la mano
- *akciano* → *etakciano*, *etakciulo* = iu, kiu posedas relative malmulte da akcioj

Iuj opinias, ke ĉi tia prefikseca uzo de ET estas erara, sed temas fakte pri tute regula uzo de ET kiel ordinara radiko. Prefikseca ET estas preciziga antaŭelemento de kombino (§37.3). Normale oni uzu ET sufikse, sed por iaj specialaj signifoj prefikseca uzo povas esti utila.

### 38.2.16. ID

ID = "naskito". Tio, kio staras antaŭ ID, ĉiam montras tion, de kio devenas la naskito.

#### Bestoj

Normale ID estas uzata ĉe besta vorto. Tiam ID montras nematuran beston, junan naskiton de la bestospeco:

- *bovo* → *bovido* = nematura bovo
- *koko* → *kokido* = nematura koko
- *hundo* → *hundido* = nematura hundo
- *rano* → *ranido* = nematura rano

#### Plantoj

Iafoje oni uzas ID por juna planto:

- *arbo* → *arbido* = juna arbo

#### Homoj

Ĉe homa vorto ID montras infanon, devenulon, sen konsidero de aĝo. Oni tiel uzas ID precipe ĉe titoloj kaj historiaj nomoj:

- *reĝo* → *reĝido* = infano de reĝo
- *grafo* → *grafido* = infano de grafo
- *Karolo* → *karolidoj* = dinastio fondita de Karolo la Granda
- *Timuro* → *timuridoj* = princoj devenintaj de sultano Timuro la Lama
- *Izraelo* → *izraelido* = deveninto de la homo Izraelo (*israelano* = ano de la lando Israelo)

#### Figura uzo

Iafoje ID estas uzata figure ĉe landa aŭ lingva vorto:

- *lando* → *landido* = homo naskita en certa lando, indiĝeno
- *Latino* → *latinida lingvo* = lingvo, kiu devenas de Latino

### Ordinara radiko

- *ido* = juna naskito de besto
- *idaro* = ĉiuj idoj aŭ posteuloj de unu homo (aŭ besto)

## 38.2.17. IG

IG = "efika, kaŭza aŭ ŝanĝa ago". Komparu kun IĜ (§38.2.18). Tio, kio staras antaŭ IG, ĉiam montras la rezulton de la ago. IG aperas plej ofte kun verba finaĵo. Ĉiuj IG-verboj estas objektaj. La objekto estas tio, kio estas ŝanĝata. La subjekto estas tio, kio kaŭzas la ŝanĝon. Legu ankaŭ pri frazroloj ĉe IG-verboj en §30.8.

### Ecaj radikoj

Oni povas fari IG-verbon el eca radiko (kiu normale estas A-vorto). Tia IG-verbo signifas, ke oni donas tian econ al la objekto:

- *akra → akrigi* = agi tiel, ke io fariĝas akra

  *Mi **akrigas** mian tranĉilon.*
- *pala → paligi* = agi tiel, ke io fariĝas pala

  *La terura novaĵo **paligis** ŝin.*
- *longa → longigi* = agi tiel, ke io fariĝas longa

  *La kunveno devus esti mallonga, sed la multaj demandoj **longigos** ĝin.*
- *pli longa → plilongigi* = agi tiel, ke io fariĝas pli longa

  *Ni devis **plilongigi** nian viziton en Hindujo.*

Teorie estas klara diferenco inter *longigi* kaj *plilongigi*, sed en la praktiko ne ĉiam estas grave, kiun el ili oni uzas. Normale oni uzas preskaŭ nur *mallongigi*, ĉar *plimallongigi* kaj *malplilongigi* estas tro longaj.

### Agaj radikoj

Oni povas fari IG-verbon el aga radiko (kiu normale estas verbo). Tia IG-verbo signifas, ke oni kaŭzas, ke iu faras la agon. La objekto de tia IG-verbo estas tio, kio estus subjekto de la simpla verbo.

Oni povas deiri de senobjekta verbo:

- *sidi → sidigi* = agi tiel, ke iu komencas sidi

  *Li **sidigis** sian infanon sur seĝon.*
- *esti → estigi* = agi tiel, ke io ekestas

  *Lia demando **estigis** longajn diskutojn.*

Oni ankaŭ povas deiri de objekta verbo. La objekto de tia IG-verbo estas aŭ la subjekto de la simpla verbo, aŭ la objekto de la simpla verbo:

- *kompreni → komprenigi* = agi tiel, ke iu komprenas

  *Mi finfine sukcesis **komprenigi** lin, ke li devas iri hejmen.*

  *Mi ne povis **komprenigi** la ŝercon al li.*
- *manĝi → manĝigi* = agi tiel, ke iu manĝas

*Mi devas* ***manĝigi*** *mian ĉevalon.* = *Mi devas doni manĝon al mia ĉevalo.*

*Ŝi* ***manĝigis*** *avenon al la ĉevalo.*

Legu pri la elekto de objekto ĉe IG-verboj el agaj radikoj en §30.8.

### Alispecaj radikoj

Oni ankaŭ povas fari IG-verbon el radiko, kiu normale estas O-vorto.

Tia IG-verbo povas signifi, ke oni agas tiel, ke la objekto fariĝas tio, kion la radiko montras:

- *edzo* → *edzigi* = agi tiel, ke iu fariĝas edzo

  *Li* ***edzigis*** *sian filon al riĉa fraŭlino.*

Tia IG-verbo ankaŭ povas signifi, ke oni faras la objekton tia kiel la radiko:

- *pinto* → *pinta* → *pintigi* = agi tiel, ke io fariĝas pinta, ke io ekhavas pinton

  *Se vi volas skribi, vi devas unue* ***pintigi*** *vian krajonon.*

Tia IG-verbo ankaŭ povas signifi, ke oni kaŭzas, ke la objekto faras ian agon, kiu rilatas al la radiko. La ago estas tiu, kiun esprimas la verba formo de la radiko:

- *flamo* → *flami* → *flamigi* = agi tiel, ke io flamas

  *Petro* ***flamigis*** *la fajron per forta blovado.*

### Frazetoj

Oni ankaŭ povas fari IG-verbon el frazeto kun rolvorteto:

- *en (la) domo* → *endomigi* = movi en (la) domon

  *Kiam komencis pluvi, ŝi rapide* ***endomigis*** *la infanojn.*

- *al la bordo* → *albordigi* = movi al la bordo

  *La ondoj* ***albordigis*** *diversajn rubaĵojn.*

- *en tombo* → *entombigi* = meti en tombon

  *Morgaŭ li* ***entombigos*** *sian patron.*

- *sen vesto* → *senvestigi* = forpreni la veston de iu

  *Janjo estis* ***senvestigita*** *kaj endormigita.* [M.13]

- *sen fortoj* → *senfortigi* = forpreni la fortojn

  *La longa malsanado tute* ***senfortigis*** *mian patrinon.*

La malon de *sen...igi* oni povas teorie esprimi per *kun...igi*, sed tiajn vortojn oni normale ne uzas, ĉar multaj simplaj verboj havas per si mem tian signifon: *maski* = *"kunmaskigi"*, *ŝarĝi* = *"kunŝarĝigi"*, *vesti* = *"kunvestigi"*. En tiaj okazoj oni povas kiel alternativon al *sen...igi* uzi la prefikson MAL (§38.3.7) sen IG: *malvesti* = *senvestigi*, *malmaski* = *senmaskigi*, *malŝarĝi* = *senŝarĝigi*. Estas do du specoj de verboj. Unu speco deiras de radiko, kiun oni rekte verbigas (*maski*, *ŝarĝi*, *vesti*). Tian verbon oni povas poste maligi per MAL (*malmaski*, *malŝarĝi*, *malvesti*). Alia speco deiras de frazeto, de

kiu oni faras IG-verbon: *sen vesto → senvestigi* (*kun vesto → "kunvestigi"*), *sen ŝarĝo → senŝarĝigi* (*kun ŝarĝo → "kunŝarĝigi"*). Ne eblas do diri ekz. **senvesti**, nek **malvestigi**. Tiaj vortoj konfuzas la du manierojn formi tiajn verbojn.

*Senfortigi* estas pli-malpli samsignifa kiel *malfortigi*. La malo de *senfortigi* estas teorie *"kunfortigi"*, sed tio estas senbezone peza vorto. Anstataŭe oni diras simple *fortigi*. Estas ankaŭ ĉi tie du specoj de verboj. Unu speco deiras de simpla A-vorto: *forta → fortigi → malfortigi*. La alia speco deiras de frazeto: *sen fortoj → senfortigi* (*kun fortoj → "kunfortigi"*). La simpla verbo *forti* signifas "esti forta". *Malforti* = "esti malforta".

Oni ne konfuzu IG-verbojn faritajn el rolvorteta frazeto (*endomigi*, *senvestigi* k.s.), kun IG-verboj, al kiuj oni poste aldonis precizigan prefiksecan rolvorteton: *ordigi* = "meti en ordon" → *kunordigi* = "meti en ordon kun io alia". *La generaloj **kunordigis** siajn militplanojn. Kunordigi* ne devenas de *kun ordo*. *Kun* ne rilatas al *ordo* sed al "io alia". Legu pli pri la diferenco inter prefiksecaj rolvortetoj en kombinoj kaj en frazetvortoj en §38.4.2.

### Vortetoj kaj afiksoj

Oni ankaŭ povas fari IG-verbon el vorteto aŭ el afikso:

- *for → forigi* = formovi, forpreni, forviŝi, forskrapi

  *Per forta lesivo ŝi sukcesis **forigi** la nigrajn makulojn.*

- *al → aligi* = aldoni, almeti

  *Ili baldaŭ discipline **aligos** siajn fortojn al tiu komuna granda armeo.* OV.448

- *trans → transigi* = movi al transa flanko, transdoni, transturni

  *La pramo **transigis** nin al la kontraŭa bordo.*

- *tro → troigi* = agi tiel, ke io estas aŭ ŝajnas troa (= tro granda, tro multa, tro grava)

  *Alkoholtrinkadon oni ne **troigu**. Li **troigis** la rakonton tiom, ke neniu kredis lin.*

- *kun → kunigi* = agi tiel, ke io fariĝas kuna; DIS → *disigi* = agi tiel, ke io fariĝas disa

  *Malfeliĉo ofte **kunigas** la homojn, kaj feliĉo ofte **disigas** ilin.* FE.42

### Ĉu uzi IG aŭ ne?

Kiam la radiko estas nek eca, nek aga, oni povas ofte heziti, ĉu uzi simplan sensufiksan verbon, aŭ verbon kun la sufikso IG.

Ofte la lingva tradicio donis al simpla verbo IG-ecan signifon:

- *fino* = la lasta parto de io → *fini* = kaŭzi ke io havu finon, meti finon al io

  *Mi **finos** mian vivon per morto.* Rz.89 Ne **... finigos ...**, kio signifus, ke oni igas iun alian fari la agon fini. *Fini* similas al *ĉesigi*. *Finigi* do similas al *ĉesigigi*.

- *masko → maski* = surmeti maskon, kaŝi per masko

  *Ŝi **maskis** sin por ke li ne rekonu ŝin.* Ne **... maskigis ...**. *Maskigi* signifas "igi iun alian maski" aŭ eble "fari maskon el io".

Iafoje la tradicio elektis uzi nur formon kun IG:

- *grupo → grupigi* = kunigi en grupo(j)n, starigi en grupo(j)n

  *La lernantoj estis **grupigitaj** po dek.* (La verbo *grupi* estas apenaŭ uzata, sed povus signifi "stari en grupo" aŭ simile.)

- *bildo → bildigi* = fari bildon de io, prezenti bilde

  *Ili ne povis **bildigi** al si la teruran okazaĵon.* (La verbo *bildi* ne estas uzata.)

Iafoje la tradicio donis malsaman signifon al la simpla formo kaj la IG-formo, sed ambaŭ signifoj estas IG-ecaj:

- *koloro → kolori* = doni al io sian koloron, esti tio kio donas koloron al io

  *La rizo estas oranĝokolora, ĉar safrano **koloras** ĝin.*

- *koloro → kolorigi* = agi tiel, ke io fariĝas kolora

  *Mi **kolorigis** la rizon per safrano.*

- *limo → limi* = esti limo de io, formi limon de io, troviĝi ĉe la limo de io

  *Meksiko **limas** norde Usonon kaj sude Gvatemalon kaj Belizon.*

- *limo → limigi* = meti limo(j)n al io, kaŭzi ke io havu limo(j)n

  *Ni devas **limigi** niajn elspezojn, ĉar niaj financaj rimedoj estas **limigitaj**.*

Oni tamen ne povas postuli, ke ĉiuj ĉiam sekvu tiujn ĉi delikatajn distingojn. Oni devas almenaŭ toleri, se iu iafoje intermiksas *kolori* kaj *kolorigi*, aŭ *limi* kaj *limigi*. La distingoj ankaŭ ne ĉiam ekzistis. Zamenhof uzis kaj *limi* kaj *limigi* por la nuna *limigi*.

Iafoje la simpla formo havas signifon, kiu ne estas IG-eca:

- *lumo → lumi* = elĵeti lumradiojn

  *La steloj **lumis** hele.* [FA3.111] (Ekzistas ankaŭ la verbo *prilumi*, §38.4.2, kiu havas iom alian signifon.)

- *lumo → lumigi* = fari tiel ke io lumu, fari luma

  *Karlo **lumigis** la lampon.*

Iafoje ambaŭ formoj havas la saman signifon:

- *ordo → ordi* aŭ *ordigi* = krei ordon, meti en ordon, fari orda

  *La ideoj kun siaj signoj estis **orditaj** laŭ specoj.* [FK.243]

  *Tuj **ordigu** bone tiun ĉambron por la gasto.* [Rz.40]

  Nuntempe oni ĝenerale preferas la formon *ordigi*, sed *ordi* estas same logika.

Ofte oni aldonas superfluan IG al verbo, kiu normale ne havu ĝin. Tio povas esti tolerata, precipe se el tio rezultas plia klareco, sed normale oni uzu la tradiciajn formojn. Ne ĉiam la formoj estas tamen tute stabilaj. En iuj okazoj

la IG-sufikso eble ne estas nepra, ĉar la simpla formo apenaŭ havas ian alian signifon. Tiam oni eble estonte ekuzos la pli mallongan formon sen IG. Ofte ambaŭ formoj povas esti uzataj paralele sen signifodiferenco: *loki/lokigi*, *arĥivi/arĥivigi*, *listi/listigi*.

### La verbo *igi*

El la sufikso IG oni povas fari la memstaran verbon *igi* (§31.5).

### IG kun ne-verba finaĵo

IG kutime aperas kun verba finaĵo, sed povas ankaŭ havi O-finaĵon, A-finaĵon aŭ E-finaĵon. Tiaj formoj montras la saman agan signifon kiel la verba formo: *akrigo* = "la ago akrigi", *akriga* = "rilata al la ago akrigi, akriganta", *sidigo* = "la ago sidigi", *sidige* = "rilate al la ago sidigi, sidigante", *edzigo* = "la ago edzigi", *edziga* = "rilata al la ago edzigi".

## 38.2.18. IĜ

IĜ = "transiro al nova stato, al nova loko, al nova ago". Komparu kun IG (§38.2.17). Tio, kio staras antaŭ IĜ, ĉiam montras la rezulton de la transiro. IĜ aperas plej ofte kun verba finaĵo. La subjekto de la verbo estas tio, kio estas ŝanĝata. IĜ-verbo ne povas havi objekton. Legu ankaŭ pri frazroloj ĉe IĜ-verboj en §30.9.

### Ecaj radikoj

Oni povas fari IĜ-verbon el eca radiko (kiu normale estas A-vorto). Tia IĜ-verbo signifas, ke la subjekto ricevas tian econ:

- *pala → paliĝi* = fariĝi pala

  *Li **paliĝis** pro la ŝoko.*
- *akra → akriĝi* = fariĝi akra

  *La ekonomia krizo **akriĝis**.*
- *longa → longiĝi* = fariĝi longa

  *La tagoj **longiĝas**, printempo alvenas.*
- *pli longa → plilongiĝi* = fariĝi pli longa

  *Li asertas, ke post la vizito al la miraklisto lia kruro **plilongiĝis**.*

### Agaj radikoj

Oni povas fari IĜ-verbon el aga radiko (kiu normale estas verbo). Estas granda diferenco inter IĜ-verbo farita el senobjekta verbo, kaj IĜ-verbo el objekta verbo.

IĜ-verbo farita el senobjekta verbo montras transiron al la ago. IĜ ĉe tia verbo estas do preskaŭ egala al la prefikso EK (§38.3.4). Iafoje tiaj ĉi IĜ-verboj montras la nuancon, ke la ago okazas per si mem, aŭ ke la ago okazas senvole:

- *sidi → sidiĝi* = komenci sidi, eksidi

  *Li **sidiĝis** sur la sofo.*

- *esti* → *estiĝi* = komenci esti, ekesti

  ***Estiĝis** kverelo inter ili.*

- *morti* → *mortiĝi* = fariĝi mortinta (senvole)

  *Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniu; unu tagon, promenante apud la reloj de fervojo, li falis sub la radojn de veturanta vagonaro kaj **mortiĝis**.* [FE.39] Jam simpla *morti* montras transiron (de vivo al morto). Ĉi tie IĜ montras, ke la morto okazis senvole, akcidente. Legu pli pri tia uzo de IĜ en la klarigoj pri verboj kaj frazroloj: §30.9.

Oni ankaŭ povas fari IĜ-verbon el objekta verbo. En tia IĜ-verbo IĜ ne montras transiran signifon. IĜ tie nur servas por fari la verbon senobjekta, por ŝanĝi la frazrolojn. Se IĜ-verbo el objekta verbo ja havas transiran signifon, tiu transira signifo troviĝas jam en la origina objekta verbo. La subjekto de IĜ-verbo farita el objekta verbo estas la objekto de la simpla verbo:

- *malfermi* → *malfermiĝi* = iĝi malfermita, esti malfermata (per si mem)

  *La knabo **malfermis** la pordon.*

  *La pordo brue **malfermiĝis**.* [M.27]

- *turni* → *turniĝi* = iĝi turnita, esti turnata (per si mem)

  *La knabo **turnis** sian kapon.*

  *La tero **turniĝas** ĉirkaŭ sia akso.*

- *vendi* → *vendiĝi* = iĝi vendita, esti vendata (per si mem)

  *Ŝi **vendis** sian aŭton.*

  *Tiuj ĉi aŭtoj **vendiĝas** tre bone.*

- *kolekti* → *kolektiĝi* = iĝi kolektita, kuniĝi, esti kolektata (per si mem)

  *La pentraĵoj **kolektis** ĉirkaŭ si amason da admirantoj.*

  *La larmoj **kolektiĝis** en ŝiaj okuloj.* [BV.85]

- *ruli* → *ruliĝi* = moviĝi per rulado, esti rulata (per si mem)

  *Kiu **rulas** ŝtonon, al tiu ĝi revenos.*

  *Ili **rulis** sian ĉaron.*

  *La vinberoj elpremite **ruliĝadis** sur la teron.* [FA4.185]

  *La amaso kuris malpli rapide ol la veturilo, kiu **ruliĝis** tre rapide.* [M.212]

- *detrui* = kaŭzi, ke io fariĝas malkonstruita aŭ finita → *detruiĝi* = fariĝi detruita, esti detruata (per si mem)

  *La bombo **detruis** la domon.*

  *Ĉiuj miaj planoj **detruiĝis**, kiam mi provis ilin en praktiko.*

Legu pri la frazroloj ĉe IĜ-verboj el agaj radikoj en §30.9.

### IĜ-verboj kaj pasivaj verboj

IĜ-verbo farita el objekta verbo ofte similas al pasiva verbo (§29). La diferenco estas, ke IĜ-verbo montras, ke la ago okazas pli-malpli per si mem, aŭ ke oni ne interesiĝas pri eventuala kaŭzanto de la ago:

- *Li **estis naskita** en Januaro.* Normala pasiva frazo. Oni atentas precipe la agon, kiu plenumiĝis kun rezulto (pro la IT-formo). Ja ekzistas aganto aŭ kaŭzanto, sed oni ne mencias ŝin. Oni povus aldoni la patrinon en la formo de *de*-komplemento: *Ŝi estas naskita de saĝulino.*
- *Li **naskiĝis** en Januaro.* Li fariĝis naskita. Pli da atento al la naskato, la infano, ol al la naskanto, la patrino, kiu apenaŭ povas aperi en tia ĉi frazo.
- *Li **estas nomata** Petro.* Normala pasiva frazo. ≈ *Oni nomas lin Petro.*
- *Li **nomiĝas** Petro.* Petro estas lia nomo, sendepende de tio, ĉu homoj uzas la nomon aŭ ne.
- *Tiu libro **estas legata** de multaj homoj.* Normala pasivo. ≈ *Multaj homoj legas tiun libron.*
- *Tiu libro **legiĝas** facile.* Efektivaj legantoj ne gravas. ≈ *Tiu libro estas facile legebla.*

### Alispecaj radikoj

Oni ankaŭ povas fari IĜ-verbon el radiko, kiu normale estas O-vorto. Tia IĜ-verbo povas signifi, ke la subjekto fariĝas ĝuste tio, kion la radiko montras, aŭ ke ĝi fariĝas simila al la radiko, aŭ ke okazas al ĝi ia ago karakterizata de la radiko:

- *edzino → edziniĝi* = fariĝi ies edzino

  *Ŝi **edziniĝis** kun sia kuzo.* [FE.39]
- *tago → tagiĝi* = fariĝi tago

  *Nun baldaŭ **tagiĝos**. Ĉu vi ne vidas la lumon ĉe la horizonto?*
- *pinto → pinta → pintiĝi* = fariĝi pinta, ekhavi (akran) pinton

  *Malgraŭ liaj penoj la krajono ne **pintiĝis**.*
- *flamo → flami → flamiĝi* = komenci flami

  *Ligno fendita facile **flamiĝas**.* [PE.404]

### Frazetoj

Oni ankaŭ povas fari IĜ-verbon el frazeto kun rolvorteto. La preciza signifo dependas de la rolvorteto. Se ekz. la rolvorteto estas loka aŭ mova, IĜ signifas "moviĝi, iri, translokiĝi":

- *en domo → endomiĝi* = veni en domon

  *Kiam la fulmotondro komenciĝis, ni tuj **endomiĝis**.*
- *al bordo → albordiĝi* = veni al bordo

  *Pro la ŝtormo la ŝipeto ne sukcesis **albordiĝi**.*
- *sen vesto → senvestiĝi* = fariĝi nuda, forpreni sian veston

*Senhonte mi **senvestiĝis** antaŭ ili.*

- *sen fortoj → senfortiĝi* = perdi siajn fortojn

  *Li **senfortiĝis** pro soifo.*
- *en (la) lito → enlitiĝi* = kuŝiĝi en (la) lito; *el (la) lito → ellitiĝi* = leviĝi el (la) lito

  *Vespere mi **enlitiĝas** malfrue, sed mi tamen frue **ellitiĝas** en la mateno.*

### Vortetoj kaj afiksoj

Oni povas ankaŭ fari IĜ-verbon el vorteto aŭ el afikso:

- *al → aliĝi* = aldoniĝi, aniĝi, anigi sin, anonci sian partoprenon

  *Al lia antaŭa embaraso **aliĝis** nun iom da konfuzo.* [M.179] *Ĉu vi jam **aliĝis** al la kongreso?*
- *sen → seniĝi* = fariĝi sena je io, liberiĝi de io

  *Mi ne plu eltenas ilin, ni devas **seniĝi** je ili.*
- *kun → kuniĝi* = fariĝi kuna, kolektiĝi, amasiĝi

  *La laboristoj **kuniĝas** ĉiun dimanĉon en la popola domo.*
- AR → *ariĝi* = fariĝi aro, kuniĝi are

  *Sur mia skribotablo daŭre **ariĝas** paperoj en plena konfuzo.*

### La verbo *iĝi*

El la sufikso IĜ oni povas fari la memstaran verbon *iĝi* (§31.2).

### IĜ kun ne-verba finaĵo

IĜ kutime aperas kun verba finaĵo, sed povas ankaŭ havi O-finaĵon, A-finaĵon aŭ E-finaĵon. Tiaj formoj montras la saman agan signifon kiel la verba formo: *akriĝo* = "la ago akriĝi", *akriĝa* = "rilata al la ago akriĝi, akriĝanta", *sidiĝo* = "la ago sidiĝi", *sidiĝe* = "rilate al la ago sidiĝi, sidiĝante", *edziĝo* = "la ago edziĝi", *edziĝa* = "rilata al la ago edziĝi", *unuiĝo* = "la ago unuiĝi".

Iafoje IĜ-vorto kun O-finaĵo ankaŭ povas montri rezulton de transira ago: ***Unuiĝo** Franca por Esperanto* (nomo de asocio) / *Post la buboj iris iom malpli rapide diversaj senlaboruloj, por kiuj ĉia homa **amasiĝo** prezentas distraĵon.* [M.210] *Dio nomis la sekaĵon Tero, kaj la **kolektiĝojn** de la akvo Li nomis Maroj.* [Gn.1]

## 38.2.19. IL

IL = "instrumento, aparato, rimedo". Tio, kio staras antaŭ IL, ricevas agan signifon. La aga signifo estas tiu, kiun la radiko havas kun verba finaĵo (§37.2.4). IL-vortoj do (normale) devenas de verboj.

### Permane uzebla instrumento

Plej ofte IL montras instrumenton, kiun oni povas uzi permane. Temas ĉiam pri instrumento speciala por la koncernata ago:

- *haki → hakilo* = instrumento por haki

- *segi* → *segilo* = instrumento por segi
- *fosi* → *fosilo* = instrumento por fosi
- *fajfi* → *fajfilo* = instrumento por fajfi
- *kudri* → *kudrilo* = pinta instrumenteto por kudri
- *tondi* → *tondilo* = instrumento por tondi (kiu konsistas el du klingoj)
- *ŝlosi* → *ŝlosilo* = instrumento, kiun oni turnas en seruro por ŝlosi aŭ malŝlosi
- *pintigi* → *pintigilo* = instrumento por pintigi (ekz. krajonon)
- *manĝi* → *manĝilo* = instrumento por manĝi (telero, kulero, tranĉilo, forko, manĝbastoneto, glaso aŭ simile)
- *linio* → *linii* → *liniilo* = instrumento, kiu helpas en desegnado de linioj

Iafoje temas pri instrumento, kiu mem faras la agon:

- *sonori* → *sonorilo* = instrumento, kiu sonoras (uzanto de sonorilo ne sonoras, sed sonorigas)

### Granda aparato

IL povas ankaŭ montri pli grandan aŭ pli ellaboritan aparaton:

- *presi* → *presilo* = maŝino por presado de libroj, gazetoj k.t.p.
- *komuniki* → *komunikilo* = helpilo por komunikado (telefono, radio, televido, gazeto k.t.p.)
- *komputi* → *komputilo* = (elektronika) aparato por prilabori informojn kaj fari tre rapidajn kalkulojn
- *amplifi* → *amplifilo* = aparato por elektre plifortigi ekz. sonojn
- *fotokopio* → *fotokopii* → *fotokopiilo* = aparato por fari fotokopiojn

### Aliaj aferoj

IL povas ankaŭ montri paperaĵon, substancon, abstraktan rimedon, komputilan programon, aŭ ion ajn, kio servas por certa ago:

- *aboni* → *abonilo* = papero, per kiu eblas ekaboni ion
- *aliĝi* → *aliĝilo* = papero, per kiu eblas aliĝi al io (ekz. kongreso)
- *kuraci* → *kuracilo* = io ajn, kio servas por kuraci (ekz. medikamento)
- *solvi* → *solvilo* = substanco per kiu oni solvas alian substancon, io per kio eblas solvi problemon
- *preventi* → *preventilo* = io, per kio eblas preventi malsanon aŭ gravediĝon (medikamento, kondomo k.t.p.)
- *kompili* → *kompililo* = komputila programo, kiu kompilas aliajn programojn
- *koloro* → *kolori* → *kolorilo* = substanco kiu servas por doni sian koloron al io, organika farbo

### Alternativoj

La sufikso IL havas tre ĝeneralan signifon. Por esprimi sin pli ekzakte oni povas fari kunmetaĵojn kun aliaj radikoj, ekz.: *presmaŝino*, *presaparato*, *segmaŝino*, *transportaparato*, *vendaŭtomato*, *fermoplato*, *kovrotuko*, *solvosubstanco*, *kompilprogramo*. Sed ofte taŭgas simpla IL-formo. Vidu ankaŭ ATOR (§39.1.6).

### Subkomprenata ago

En iuj malmultaj IL-vortoj la aga elemento estas subkomprenata. Tio, kio staras antaŭ IL, ne mem montras agon, sed ekz. rezulton de ago:

- *fajro* → *fajrilo* [FA1.5] = ilo por fari fajron (ne "ilo por fajri")
- *rekto* → *rektilo* = instrumento por desegni rektajn liniojn (ne "ilo por rekti")
- *angulo* → *angulilo* = instrumento por difini aŭ desegni angulojn (ne "ilo por anguli")
- *disko* → *diskilo* = aparato, kiu legas (komputilan) diskon kaj skribas sur ĝi (ne "ilo por diski")

Oni povas diri, ke tiaj vortoj estas mallongigoj de ekz. *fajrigilo*, *anguldesegnilo*, *rektofarilo*, *diskoturnilo* aŭ simile. Oni estu tre ŝparema pri tiaj IL-vortoj por ne riski konfuzon. Normale oni faru IL-vortojn nur el verboj.

### Ne ĉiuj iloj havas IL-sufikson

Ekzistas multaj simplaj radikoj, kiuj estas nomo de ia instrumento aŭ simile. Al tia vorto oni ne aldonu IL. Tiaj vortoj estas ekz. manĝiloj kiel *kulero*, *forko* kaj *glaso*, pafiloj kiel *revolvero*, *kanono* kaj *fusilo* (nekunmetita!), transportiloj kiel *aŭto*, *buso* kaj *biciklo*, kaj muzikiloj kiel *gitaro*, *piano* kaj *fluto*, kaj ankoraŭ multaj diversaj ĉiutagaj iloj kiel *martelo*, *broso*, *peniko*, *krajono*, *lupeo*, *serpo* k.t.p.

Pri la radiko ARM regas konfuzo. La O-formo estas preskaŭ neniam uzata, sed Zamenhof iam uzis ĝin kun la signifo "batalilo": *Ne servas larmo anstataŭ **armo**.* [PE.507] Normale oni uzas la formon *armilo*. La verboformo *armi* tamen signifas "provizi per bataliloj", kaj *armilo* do devus signifi ne "batalilo", sed "ilo por provizi per bataliloj". Se oni uzus ĉiam *armo* anstataŭ *armilo*, ĉiuj vortformoj fariĝus tute logikaj, sed *armilo* estas forte enradikiĝinta.

El la nekunmetita vorto *aviadi* (= "flugi per aparato pli peza ol aero") oni faris la vorton *aviadilo* (= "tia flugmaŝino"). Nuntempe kelkaj uzas anstataŭe la nekunmetitan vorton *avio*. El ĝi oni povas fari la verbon *avii* kaj la agvorton *aviado*. Sed ankoraŭ *aviadilo* estas la normala formo. Aliaj similsignifaj vortoj estas *flugmaŝino* (= "ĉia aparato por flugi") kaj *aeroplano* (la plej ofta speco de avio).

### Ordinara radiko

- *ilo* = instrumento, rimedo

- *ilaro* = kolekto de laboriloj
- *ilujo* = ujo por ilo(j)

### 38.2.20. IN

IN = “la naskopova sekso”. La sufikson IN oni povas uzi nur ĉe io, kio povas havi sekson, nome homo aŭ besto. IN ne ŝanĝas la bazan signifon de la vorto, sed nur aldonas in-seksan signifon (kaj forprenas eventualan virseksan signifon).

> **Noto:** Oni do ne uzas vortojn kiel **belino**, **virgino** k.s., ĉar *belo* kaj *virgo* estas ecoj, kaj ecoj ne povas havi sekson. Oni devas unue krei la vortojn *belulo* kaj *virgulo*, kiuj montras ion, kio povas havi sekson. El tiuj vortoj oni poste faras *belulino* kaj *virgulino*. Nur en poezio k.s. oni povas renkonti vortojn kiel **virgino**.

Legu ankaŭ pri seksa signifo de O-vortoj en §4.3, kaj pri IN en propraj nomoj en §35.3.

#### IN ĉe viraj vortoj

Plej ofte oni aldonas IN al vorto, kiu havas viran signifon. La vorto tiam ekhavas anstataŭe in-seksan signifon:

- *patro* → *patrino* = homino, kiu naskis infanon
- *viro* → *virino* = plenkreska homino
- *knabo* → *knabino* = juna homino
- *onklo* → *onklino* = fratino de patro aŭ patrino
- *avo* → *avino* = patrino de patro aŭ patrino
- *fraŭlo* → *fraŭlino* = needziniĝinta virino
- *reĝo* → *reĝino* = virino kiu regas same kiel reĝo, edzino de reĝo

#### IN ĉe sekse neŭtralaj vortoj

Oni ankaŭ povas aldoni IN al vorto, kiu estas sekse neŭtrala, sed tio okazas multe malpli ofte. La sekse neŭtrala vorto tiam ekhavas in-seksan signifon:

- *homo* → *homino* = ina homo
- *aŭtoro* → *aŭtorino* = ina aŭtoro
- *agento* → *agentino* = ina agento
- *pasaĝero* → *pasaĝerino* = ina pasaĝero
- *estro* → *estrino* = ina estro
- *besto* → *bestino* = ina besto
- *simio* → *simiino* = ina simio
- *muso* → *musino* = ina muso
- *mortinto* → *mortintino* = mortinta virino

Ĉe sekse neŭtrala vorto oni povas montri viran sekson per la radiko VIR uzata prefiksece aŭ A-vorte (§38.4.1).

### Inaj radikoj

Ekzistas kelkaj vortoj, kiuj en si mem estas in-seksaj: *damo*, *femalo*, *hetajro*, *putino* (nekunmetita!) k.a. Al tia vorto oni ne aldonu IN.

### Figura uzo

Iafoje oni faras figurajn IN-vortojn, kiuj montras aferon, kiun oni prezentas kvazaŭ inon:

- *jambo → jambino* = speco de verso, kies ritmon oni tradicie kaj figure nomas ina
- *ŝraŭbo → ŝraŭbino* = trueto, en kiun oni metas ŝraŭbon (oni teorie devus diri *ŝraŭbingo*, §38.2.22, sed tiu vorto havas iom alian signifon)

### Ordinara radiko

- *ino* = ina besto (aŭ homo)
- *ina* = tia kiel ino, rilata al ino k.s.
- *ineto* = malgranda ina besto (aŭ homo)
- *investaĵo* = vestaĵo por virino, virina vestaĵo
- *malino* = vira besto aŭ homo (iafoje uzata ŝerce anstataŭ *viro*, sed ankaŭ serioze, kiam oni volas inkluzivi virhomojn de ĉiuj aĝoj)

### Ŝajnafikso

Apud *heroino* = "ina heroo", kaj *urino* = "ina uro", ekzistas la nekunmetitaj vortoj *heroino* (drogo) kaj *urino* (likvo), en kiuj "in" estas ŝajnsufikso. Ekzistas ankoraŭ multaj tiaj vortoj kun ŝajna IN-sufikso: *kombino*, *margarino*, *maŝino*, *medicino*, *origino*, *parafino*, *rutino*, *tamburino*, *turbino*, *Berlino*, *Kalvino* k.a. En iuj okazoj oni evitis ŝajnan IN-sufikson uzante "en" anstataŭ "in": *azeno*, *delfeno*, *ermeno*, *frakseno*, *jasmeno*, *rosmareno*, *rubeno*, *sukceno*, *tendeno*, *plateno* k.a.

> **Noto:** Apud la Fundamenta vorto *plateno*, certa metalo, ekzistas dekomence ankaŭ la formo *platino* [FK.233] kun la sama signifo. Ambaŭ estas tute bonaj vortoj. Ekzistas ankaŭ tute alia *platino*, speco de tabulo uzata en presado, sed tiu vorto estas evitinda. Oni uzu *plateto* aŭ simile pri tiaj aferoj.

Ekzistas ankaŭ tre multaj vortoj, kiuj havas "in" kiel ŝajnprefikson. La historia signifo de tiaj "in" estas ofte *en* aŭ MAL: *inaŭguri*, *incizi*, *indukti*, *infiltri*, *influi*, *indiferenta*, *individuo*, *inerta*, *infinito*, *inklino* k.a.

## 38.2.21. IND

IND = "meritas aŭ valoras esti farata". Komparu kun EBL (§38.2.7) kaj END (§38.2.12). Tio, kio staras antaŭ IND, ĉiam ricevas agan kaj pasivan signifon. La aga signifo estas tiu, kiun la radiko havas kun verba finaĵo (§37.2.4). IND-vortoj do ĉiam devenas de verboj. Oni principe povas uzi IND nur ĉe objektaj verboj:

- *ami → aminda* = tia, ke ĝi meritas esti amata
- *legi → leginda* = tia, ke ĝi valoras esti legata
- *vidi → vidinda* = tiel bela aŭ bona, ke ĝi valoras esti vidata
- *fidi → fidinda* = tia, ke ĝi meritas esti fidata

- *bedaŭri → bedaŭrinde* = tiel (malbone), ke bedaŭro estas meritata

En kelkaj okazoj oni faras IND-vorton el verbo, kiu ordinare ne estas objekta:

- *ridi → ridinda* = tia, ke ĝi meritas, ke oni ridu ĝin (= pri ĝi). Ordinare oni ridas pri io aŭ pro io, sed principe oni povas uzi la verbon *ridi* ankaŭ en aliaj manieroj, ekzemple kun rekta objekto: *Mi ridas je lia naiveco (aŭ mi ridas pro lia naiveco, aŭ: mi ridas lian naivecon).* [FE.29]
- *miri → mirinda* = tiel eksterordinara, ke ĝi meritas, ke oni miru ĝin (= pri ĝi).
- *plori → plorinde* = tiel (malbone), plorado estas meritata

### IND ≈ END

Komence la sufikso END (§38.2.12) ne ekzistis, kaj oni uzis IND ankaŭ kun la signifo de END ("devas esti farata"). Tiu uzo de IND ne estas tute malaperinta:

- *ne pardoni → nepardoninda* = tia, ke oni devas ne pardoni ĝin, nepardonenda
- *kaŝi → kaŝinda* = tia, ke ĝi meritas aŭ eĉ devas esti kaŝata, kaŝenda
- *konsideri → konsiderinda* = tia, ke ĝi meritas esti konsiderata, tia ke oni ne povas ne konsideri ĝin pro ĝia forto, amplekso k.s.
- *Konstrui sur ĝi* [= la diletanteco] *sian ekzistadon fizikan* [...] *estas nefareble kaj **nefarinde**.* [M.74] = *... ne devas esti farate.*

### Ordinara radiko

- *inda* = merita, valora
- *indo* = merito, valoro
- *indigi* = fari inda
- *mortinda* = inda je morto, tiel grava ke iu pro ĝi meritas morton: *mortinda peko*, *mortinda ofendo*
- *prezoinda* = inda je sia prezo, sufiĉe valora por sia prezo

La nekutimaj vortoj *mortinda* kaj *prezoinda* ne sekvas la ordinaran regulon, ke antaŭ IND la radiko ĉiam havu agan kaj pasivan signifon. Oni devas diri, ke IND en tiuj vortoj ne estas uzata kiel sufikso, sed kiel ordinara radiko. La ligfinaĵo O en *prezoinda* respegulas tion, ĉar afikso normale neniam havas ligfinaĵon. Tia uzado de ligfinaĵo estas tamen malofta kaj eksperimenta. Oni ankaŭ povas uzi dividostrekon en tiaj vortoj: *mort-inda*, *prez-inda*. Elparole oni tiam normale uzas kromakcenton (§2.2) je MORT aŭ PREZ.

## 38.2.22. ING

ING = "tenilo, en kiun oni (parte) metas ion". Komparu kun UJ (§38.2.29). Tio, kio staras antaŭ ING, normale estas tio, kion oni parte enmetas en la ingon:

- *glavo → glavingo* = tubeca objekto, en kiun oni metas la klingon de glavo

- *cigaro* → *cigaringo* = tubeto, en kiu oni tenas cigaron por fumi ĝin
- *ŝraŭbo* → *ŝraŭbingo* = ringo, en kiun oni ŝraŭbas ŝraŭbon
- *ovo* → *ovingo* = vazeto, en kiun oni metas ovon por ĝin manĝi
- *piedo* → *piedingo* = ringo, en kiun oni metas piedon por surĉevaliĝi kaj rajdi
- *fingro* → *fingringo* = fingropinta protekta ĉapo uzata dum kudrado

Iafoje la elemento antaŭ ING ne estas tio, kion oni enmetas en la ingon:

- *pendi* → *pendingo* = pendumilo, aparato por ekzekuti homon per pendumo. Oni povus diri, ke *pendingo* estas mallongigo de *pendumatingo* (*pendumato* = “homo, kiun oni pendumas”). Normale oni tamen diras *pendumilo*.

### Ordinara radiko

- *ingo* = glavingo, ia ajn tenilo kiu parte kovras ion
- *ingi*, *eningigi* = enmeti en ingon
- *elingigi* = eligi el ingo

## 38.2.23. ISM

ISM = “doktrino, movado, sistemo, agmaniero” k.s. Iafoje ISM-vorto ankaŭ montras unuopan ekzemplon de ia speciala agmaniero. La signifo de ISM treege varias, kaj tre dependas de tio, post kio ĝi staras. (La sufikso ISM estis oficialigita en 1919 en la *Dua Oficiala Aldono al Universala Vortaro*.)

Legu pri paraj “ist”-vortoj kaj “ism”-vortoj en §38.2.24.

### Persona nomo

ISM povas stari post propra nomo de persono:

- *Budho* → *Budhismo* = la religio fondita de Budho
- *Stalino* → *Stalinismo* = la politikaj ideoj de Stalino
- *Zamenhof* → *Zamenhofismo* = la ideario de Zamenhof (vidu ĉi-poste pri alia senco de tiu vorto)

### Adepto

ISM povas stari post vorto por adepto de fama persono:

- *Kristo* → *kristano* → *kristanismo* = la religio de la kristanoj, la religio de Kristo. (La pli simpla formo *kristismo* estas tute logika, sed multe malpli ofta.)
- *Konfuceo* → *konfuceano* → *konfuceanismo* = la filozofio de la konfuceanoj, la filozofio de Konfuceo. (Oni ofte uzas la pli simplan formon *konfuceismo*.)

En tiaj vortoj AN (§38.2.4) estas superflua (sed ne mallogika). Oni uzas ĝin pro influo de nacilingvaj vortoj.

### Temo, karakterizaĵo

ISM povas stari post temo aŭ karakterizaĵo de la sistemo, doktrino k.t.p.:

- *kolonio* → *koloniismo* = ekspluatado de kolonioj fare de forta ŝtato
- *spirito* → *spiritismo* = kredo, ke eblas kontakti spiritojn de mortintoj
- *vegetara* → *vegetarismo* = sistema nemanĝado de viando
- *komuna* → *komunismo* = politika sistemo bazita sur komuna posedado
- *kapitalo* → *kapitalismo* = ekonomia sistemo de privata kapitalposedo
- *kubo* → *kubismo* = stilo de pentrado, kiu uzas kubecajn figurojn
- *alkoholo* → *alkoholismo* = malsana dependeco de alkoholo
- *plumbo* → *plumbismo* = malsano pro veneniĝo de plumbo
- *internacia* → *internaciismo* = sistema strebado al internacia kunlaboro
- *nova* → *novismo* = tendenco ĉiam voli krei ion novan
- *...adas* → *adasismo* = (mallerta) rimado per sufiksoj (ekz. AD), ekzemplo de tia rimado (ekz. *kantadas – amadas*)

### Speco de persono

ISM povas esti aldonita al vorto por persono aŭ speco de persono. Tia ISM-vorto montras agmanieron de tia persono:

- *kanibalo* → *kanibalismo* = homomanĝado fare de homo
- *diletanto* → *diletantismo* = amatoreca kaj fuŝema agado
- *patrioto* → *patriotismo* = amo kaj sindediĉo al la propra patrujo
- *Zamenhof* → *zamenhofismo* = esprimomaniero propra al Zamenhof (vidu ĉi-antaŭe pri alia senco de tiu vorto)

### Lingvo

Post nomo de lingvo ISM montras dirmanieron propran al tiu lingvo:

- *la angla lingvo* → *anglismo* = apartaĵo de la angla lingvo
- *la ĉina lingvo* → *ĉinismo* = apartaĵo de la ĉina lingvo
- *Latino* → *latinismo* = apartaĵo de Latino

*Anglaĵo*, *ĉinaĵo* k.t.p. povas esti io ajn dirita aŭ skribita en la lingvo. En tiaj vortoj mankas la ideo, ke temas pri esprimo aparta aŭ speciala.

### Ordinara radiko

- *ismo* = doktrino, kredo, pensosistemo (ofte kun ia ironia aŭ malŝata nuanco)

*Je unu ismo*
*Mi tutsincere kredas –*
*Je la abismo!*

hajko de *Daphne Lister*

### 38.2.24. IST

IST = “persono, kiu ofte okupiĝas pri io (eble profesie)”. Komparu kun AN (§38.2.4) kaj ISM (§38.2.23). Tio, kio staras antaŭ IST, ĉiam estas tio, pri kio okupiĝas la persono.

Estas ofta miskompreno, ke IST egalas al “profesiulo”, sed ĝia vera signifo estas pli vasta:

- *verki* → *verkisto* = persono, kiu ofte verkas
- *instrui* → *instruisto* = persono, kiu profesie instruas
- *kuraci* → *kuracisto* = persono, kiu profesie kuracas
- *dento* → *dentisto* = kuracisto de dentoj
- *arto* → *artisto* = persono, kiu praktikas arton
- *lignaĵo* → *lignaĵisto* = persono, kiu metie faras lignaĵojn
- *biciklo* → *biciklisto* = persono, kiu ofte biciklas
- *ŝteli* → *ŝtelisto* = persono, kiu ofte ŝtelas
- *komerco* → *komercisto* = persono, kiu profesie komercadas
- *akuŝi* → *akuŝisto* = persono, kiu profesie helpas ĉe akuŝado (sed ne mem akuŝas), naskohelpisto
- *Esperanto* → *esperantisto* = persono, kiu scias kaj uzas Esperanton

IST-vorto povas esti plursignifa. Je bezono eblas fari pli precizajn vortojn. Anstataŭ la ĝenerala *fiŝisto* oni povas paroli pri *fiŝkaptisto*, *fiŝbredisto* aŭ *fiŝvendisto*. La formon *dentisto* oni povas precizigi al *dentokuracisto*, sed tio normale estas superflua.

*Esperantisto* tradicie kaj kutime estas ĉiu, kiu scias kaj uzas la lingvon, sed sufiĉe ofte oni renkontas la ideon, ke *esperantisto* devus signifi nur “aktiva ano de la Esperanto-movado” aŭ simile. IST tamen nur montras, ke la persono ofte okupiĝas pri la afero. Ne devas esti profesieca aŭ simila okupiĝo. Sed oni ne uzas IST por parolantoj de ordinaraj lingvoj. Oni ne diras *anglisto* por “parolanto de la angla”, sed *anglalingvano* (*anglisto* signifas “specialisto pri la angla”).

#### IST kaj ISM

Por IST-vorto ofte ekzistas simila ISM-vorto. La rilatoj inter la du formoj de tiaj vortparoj povas esti tre diversaj:

- *alkoholisto* = persono dependa de alkoholo, trafita de alkoholismo
- *alkoholismo* = malsana dependeco de alkoholo
- *kapitalisto* = persono, kiu posedas multan kapitalon
- *kapitalismo* = ekonomia sistemo de privata kapitalposedo

- *esperantisto* = persono, kiu scias kaj uzas Esperanton
- *esperantismo* = 1. penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa 2. lingva apartaĵo de Esperanto

Ekzistas ankaŭ tre multaj vortoj, kiuj finiĝas per "ist" aŭ "ism", kaj kiuj ja montras diversajn istojn kaj ismojn, sed kiuj tamen ne estas kunmetitaj, ekz.: *turisto – turismo*, *faŝisto – faŝismo*, *ekzistencialisto – ekzistencialismo*, *rojalisto – rojalismo*, *nihilisto – nihilismo*, *feministo – feminismo*. Tiuj vortoj ne devenas de **turo**, **faŝo**, **ekzistencialo**, **rojalo** k.t.p. En tiaj okazoj "ist" kaj "ism" estas ekssufiksoj (§37.6). Iafoje oni provas elserĉi signifon por la ŝajna radiko de tiaj ĉi vortoj, kaj fari el tio novan veran radikon. Tio povas esti bona, se la tiel kreita vorto estas efektive utila, sed ofte nur rezultas superflua duoblaĵo de jam ekzistanta vorto, aŭ vorto praktike neuzebla. Preskaŭ ĉiam estas plej saĝe lasi tiajn ŝajnkunmetaĵojn en paco.

### IST = ISM-AN

Ofte IST signifas "subtenanto de la responda ismo". Tiam IST = ISM-AN:

- *marksisto* = marksismano, subtenanto de marksismo
- *oportunisto* = oportunismano, iu kiu agas laŭ oportunismo
- *komunisto* = komunismano, subtenanto de komunismo

Rimarku, ke IST ne ĉiam egalas al ISM-AN. Ekz. *kapitalisto* ne egalas al *kapitalismano*.

### IST kaj AN

AN kaj IST estas en iaj okazoj tre proksimaj. Tiam oni povas elekti laŭplaĉe. Oni kutimas uzi tiun el la du sufiksoj, kiu donas la plej internacian formon. Oni ekz. normale parolas pri *Kristo*, *kristano* kaj *kristanismo*. La formoj *krististo* kaj *kristismo* preskaŭ neniam aperas. Ili estas same logikaj, sed malpli internaciaj. Komparu kun *Budho*, *budhisto* kaj *budhismo*, kie la prefero estas mala, ankaŭ pro internacieco. Apud *budhisto* oni uzas ankaŭ *budhano*, same logikan, sed pri *budhanismo* oni ne parolas. (Iuj uzas anstataŭe *Budao*, *budaisto* kaj *budaismo*.) Anstataŭ *esperantisto* oni same logike povus diri *esperantano*. Sed en la praktiko nur *esperantisto* estas uzata. (Laŭ *PIV* la vorto *esperantano* signifas "aprobanto de Esperanto".)

### Figura IST

IST ankaŭ estas uzebla figure por doni individuecan karakteron al senviva afero: *krozi* → *krozisto* = "milita krozoŝipo". Sed pro la konfuzorisko tiaj vortoj estas praktike apenaŭ uzataj. La sufikso UL estas pli ofte uzata en tia figura maniero (§38.2.30).

### Ne ĉiuj istoj havas IST-sufikson

Ekzistas multaj simplaj vortoj por profesiuloj k.s. Al tia vorto, kiu jam per si mem montras personon, oni ne aldonu IST: *ĥirurgo*, *astronomo*, *ekologo*, *diplomato*, *gimnasto*, *ŝoforo*, *barbiro*, *studento*, *kelnero*, *aktoro*, *mimo*, *generalo*, *soldato*, *kuratoro*, *profesoro* k.t.p.

Oni do nepre ne diru **ĥirurgisto**, **astronomisto**, **ekologisto** k.t.p. Sed en multaj okazoj oni povas tamen per la sufikso IST krei paralelan vorton por tia persono, se ekzistas aparta vorto por tio, pri kio li okupiĝas:

- *ĥirurgio* → *ĥirurgiisto* = ĥirurgo
- *astronomio* → *astronomiisto* = astronomo
- *ekologio* → *ekologiisto* = ekologo
- *diplomatio* → *diplomatiisto* = diplomato
- *gimnastiko* → *gimnastikisto* = gimnasto
- ***Diplomatiiston** oni povas ankaŭ nomi diplomato, sed **fizikiston** oni ne povas nomi fiziko, ĉar fiziko estas la nomo de la scienco mem.* [FE.32]

### 38.2.25. NJ

Per NJ oni faras karesajn nomojn de virinoj. Komparu kun ĈJ (§38.2.6) kaj ET (§38.2.15). Antaŭ NJ oni uzas mallongigitan formon de la nomo. Kutime oni konservas ĉirkaŭ 1 ĝis 5 literojn:

- *Mario* → *Manjo* [FE.38] aŭ *Marinjo* [FE.38]
- *Klaro* → *Klanjo* [FE.38]
- *Sofio* → *Sonjo* [FE.38] aŭ *Sofinjo* [FE.38]
- *patrino* → *panjo* [Rz.20] aŭ *Panjo*
- *onklino* → *Onjo*
- *fratino* → *Franjo*
- *knabino* → *Knanjo*

Uzante NJ oni normale forigas eventualan IN-sufikson. Iafoje oni tamen povus reteni la vokalon de IN, se tio helpus krei pli bonsonan formon: *kuzino* → *Kuzinjo* [M.47], *knabino* → *Knabinjo*. Eble oni eĉ povas uzi superfluan IN-sufikson, se tio helpas al bonsoneco: *Klaro* → *Klarino* → *Klarinjo*. Legu pri tia formale ne tute logika uzo en la klarigoj pri ĈJ en §38.2.6.

Legu ankaŭ pri la proponita neduuma sufikso IP° en §39.1.18 kaj la proponitaj karesnomaj sufiksoj J° kaj PJ° (§39.1.23).

### 38.2.26. OBL

OBL = "multipliko". Komparu kun ON (§38.2.27) kaj OP (§38.2.28). OBL estas uzebla nur ĉe nombrovortoj kaj similsignifaj vortoj. Tio, kio staras antaŭ OBL, ĉiam montras, per kiom oni multiplikas:

- *du* → *duobla* = multiplikita per du
- *du* → *duoble* = multiplikite per du
- *du* → *duoblo* = kvanto duobla
- *dek* → *dekobla* = multiplikita per dek
- *dek* → *dekoble* = multiplikite per dek
- *dek* → *dekoblo* = kvanto dekobla
- *cent dek du* → *cent-dek-du-obla* = multiplikita per 112

- *cent dek du → cent-dek-du-oble* = multiplikite per 112
- *cent dek du → cent-dek-du-oblo* = kvanto 112-obla
- *multe → multobla* = multiplikita per multe (per alta nombro)
- *multe → multoble* = multiplikite per multe
- *multe → multoblo* = kvanto multobla
- *3,14 (tri komo unu kvar) → 3,14-oble (tri-komo-unu-kvar-oble)* = multiplikite per 3,14
- *Por ĉiu tago mi ricevas kvin frankojn, sed por la hodiaŭa tago mi ricevis* ***duoblan*** *pagon, t. e.* [...] *dek frankojn.* [FE.14]
- *Proksime de ili staris ankoraŭ alia figuro de* ***triobla*** *grandeco.* [FA2.105]
- ***Kvinoble*** *sep estas tridek kvin.* [FE.14]
- *Cent estas la* ***dekoblo*** *de dek.*
- *Ĉi tiu* [lumradio] *flugas* ***deknaŭ-milionoble*** *pli rapide, ol la plej bona vetkuristo.* [FA1.126] Se oni multiplikas la rapidecon de la plej bona vetkuristo per dek naŭ milionoj, oni ricevas la rapidecon de lumradio.
- ***Kiomoble*** *tri estas dek kvar? = Per kiom oni devas multipliki tri por ricevi dek kvar?*

Legu pli pri matematikaj esprimoj en §23.7.

### Plurpartaj aferoj

OBL-vorto kun A-finaĵo ankaŭ povas signifi, ke io konsistas el tiom da partoj:

- *duobla vesto* = vesto, kiu konsistas el du tavoloj da vestaĵoj
- *duobla fadeno* = du apudmetitaj fadenoj uzataj kiel unu
- *duobla lito* = lito por du personoj
- *duobla kaverno* = kaverno duparta - ĉiu el la du partoj estas jam per si mem kaverno
- *duobla sago* = unu sago konsistanta el du partoj, kiuj ĉiu per si mem jam aspektas kiel (parta) sago (↔)

### Skribomaniero

Antaŭ OBL oni ĉiam kunskribas la nombron. Oni povas por klareco uzi dividostrekojn. La strekojn oni metu normale tie, kie estas spacetoj en la origina nombro (§23.1.1):

- *dek du → dekduoblo* aŭ *dek-duoblo*
- *dudek → dudekoblo*
- *tricent tridek → tricenttridekobla* aŭ prefere *tricent-tridekobla*
- *du mil dudek → dumildudekoble* aŭ prefere *du-mil-dudekoble*
- *0,123 (nul komo unu du tri) → nul-komo-unu-du-tri-oble*

La samaj skriboreguloj validas por la sufiksoj ON (§38.2.27) kaj OP (§38.2.28).

### OBL kaj FOJ

Okaze oni uzas la radikon FOJ anstataŭ OBL. Eĉ Zamenhof tion faris: *Se ni havus materialajn rimedojn, nia afero irus cent **fojojn** pli rapide.* [OV.102] = *... irus centoble pli rapide.* Normale oni tamen ne konfuzu ilin. *Fojo* = "aparta okazo". *Dufoja pago* estas do pago, kiu okazas du fojojn, je du malsamaj okazoj. *Duobla pago* estas pago duoble tiel granda kiel normale.

### Ordinara radiko

- *oble* = multiplikite per (§23.7)
- *obligi* = multipliki

### 38.2.27. ON

ON = "divido". Komparu kun OBL (§38.2.26) kaj OP (§38.2.28). ON estas uzebla nur ĉe nombrovortoj kaj similsignifaj vortoj. Tio, kio staras antaŭ ON, ĉiam montras, per kiom oni dividas:

- *du* → *duono* = unu el du egale grandaj partoj de tuto, ½
- *du* → *duona* = granda kiel duono, estanta duono (de io)
- *du* → *duone* = grande kiel duono, estante duono (de io)
- *dek* → *dekono* = unu el dek egale grandaj partoj de tuto, 1/10
- *dek* → *dekona* = granda kiel dekono, estanta dekono (de io)
- *dek* → *dekone* = grande kiel dekono, estante dekono (de io)
- *dek tri* → *dektriono* aŭ *dek-triono* = 1/13
- *mil* → *milono* = 1/1000
- *mil ducent* → *milducentono* aŭ prefere *mil-ducentono* = 1/1200
- *miliono* → *milionono* = 1/1000000
- *Tri estas **duono** de ses.* [FE.14]
- *Ok estas kvar **kvinonoj** de dek.*
- *Unu tago estas **tricent-sesdek-kvinono** aŭ **tricent-sesdek-sesono** de jaro.* [FE.14]
- *El multaj **milonoj** fariĝas milionoj.* [PE.981]
- *Li povoscias kalkuli en la kapo, eĉ kun **nombronoj**.* [FA2.55] = *... kun frakcioj.*
- *Ŝi restis kvar kaj **duonan** horojn.* = *Ŝi restis kvar horojn kaj duonan horon. Duona horo* = *duono de horo*.
- *Mi volas aĉeti unu kaj **kvaronan** kilogramojn.*
- *Mi almenaŭ **duone** plenumos vian deziron.* [FA2.140] *Duone* = "en duona maniero, en duona amplekso, ĝis duono".
- *Per okuloj **duone** mirantaj kaj **duone** kortuŝitaj ŝi rigardis ŝin dum momento.* [M.93]
- *Ĉiuj arboj kaj arbetaĵoj estis polipoj, **duone** besto **duone** kreskaĵo.* [FA1.94]
- ***Duone** li tremis, **duone** li estis feliĉa.* [FA1.213]

Por ON-vortoj oni uzas la samajn skriboregulojn kiel por OBL (§38.2.26).

### Prefiksece

ON-vortoj estas ankaŭ uzataj prefiksece:

- *duonhoro* = *duona horo* = *duono de horo*
- *kvaronkilometro* = *kvarona kilometro* = *kvarono de kilometro*
- *trionparto* = *triona parto* = *triono*

Prefikseca DUON havas ankaŭ specialajn signifojn (§38.4.1).

### Ordinara radiko

- *one* = dividite per (§23.7)
- *ono* = frakcio
- *onigi* = dividi (matematike)

### ON kaj PART

Iafoje oni konfuzas ON kun la radiko PART. Oni ne povas diri ekz. **landono** por *landparto* = "parto de lando". ON ne montras parton de tio, kio staras antaŭ ĝi, sed parton de io alia. *Triono* ne estas parto de *tri*, sed unu el tri egale grandaj partoj de io alia. Komparu ankaŭ kun ER (§38.2.13).

En la komenco oni uzis iafoje la evitendajn esprimojn *dua parto*, *tria parto* k.t.p. anstataŭ *duona parto*, *triona parto* aŭ plej simple *duono*, *triono*.

### 38.2.28. OP

OP = "grupo kun certa nombro da membroj". Komparu kun OBL (§38.2.26) kaj ON (§38.2.27). OP estas uzebla nur ĉe nombrovortoj kaj similsignifaj vortoj. Tio, kio staras antaŭ OP, ĉiam montras, kiom da membroj estas en la grupo:

- *unu* → *unuopo* = unu sola afero aŭ persono
- *unu* → *unuopa* = sola, rigardata aparte
- *unu* → *unuope* = ĉiu por si mem
- *du* → *duopo* = grupo de du, paro
- *du* → *duopa* = konsistanta el du membroj
- *du* → *duope* = en grupo kun du membroj, en grupoj po du
- *dek* → *dekopo* = grupo de dek
- *dek* → *dekopa* = konsistanta el dek membroj
- *dek* → *dekope* = en grupo kun dek membroj, en grupoj po dek
- *Tiuj ĉi du amikoj promenas ĉiam **duope**.* [FE.14] Ili promenas ĉiam ambaŭ kune.
- ***Kvinope*** [= kvin personoj kune] *ili sin ĵetis sur min, sed mi venkis ĉiujn kvin atakantojn.* [FE.14]
- *En la salono ludis **kvaropo** da muzikistoj.*

- *Ni demandis ĉiun **unuopan** personon aparte, sed ĉiu respondis tute same.*
- *La registaro devas protekti la rajtojn de **unuopuloj**. = ... de unuopaj personoj.*
- ***Kiomope** ni ludu? ≈ Po kiom da personoj estu en la grupoj, kiam ni ludos?*
- *Rigardu, kiel **multope** jam aliĝis al ni la britoj, kiuj tiel nevolonte lernas aliajn lingvojn krom sia nacia.* OV.374 La grupo de aliĝintaj britoj konsistas el multaj personoj.
- ***duopa** interparolo* = interparolo inter du personoj
- ***triopa** laborgrupo* = laborgrupo konsistanta el tri personoj

Se temas pri objekto, kiu konsistas el du partoj, ĉiu el kiuj estas per si mem tia objekto, tiam oni ne uzas OP, sed OBL (§38.2.26).

Por OP-vortoj oni uzas la samajn skriboregulojn kiel por OBL (§38.2.26).

Antaŭ O-finaĵo la sufikso OP estas forlasebla, ĉar simpla O-formo havas ĉe nombrovortoj interalie la signifon de opo:

- *duo* = duopo aŭ la nombro du
- *trio* = triopo aŭ la nombro tri
- *deko* = dekopo aŭ la nombro dek

### Ordinara radiko

- *opa* = kolektiva
- *ope* = kolektive
- *opo* = kolektiva grupo

## 38.2.29. UJ

UJ = "io, kio estas destinita enhavi ion certan". Komparu kun ING (§38.2.22) kaj EJ (§38.2.10).

UJ havas praktike tri malsamajn signifojn: "entenilo", "kreskaĵo" kaj "lando". Tio, kio staras antaŭ UJ, ĉiam montras tion, kio estas (aŭ okazas) en la afero.

### Enteniloj

UJ povas montri specialan entenilon, vazon, skatolon k.t.p., kiu servas por enhavi ion, aŭ en kiu oni faras ian agon:

- *salo → salujo* = vazeto, en kiu oni tenas salon por uzo ĉe manĝotablo
- *teo → teujo* = skatolo por tefolioj
- *cigaro → cigarujo* = skatoleto por cigaroj
- *abelo → abelujo* = artefarita loĝejo por abeloj (natura loĝejo de abeloj povas esti *abelejo*, sed tiu vorto signifas ankaŭ "loko, kie abelbredisto tenas abelujojn")
- *mono → monujo* = saketo (aŭ alispeca entenileto) por porti monon

- *cindro* → *cindrujo* = vazeto por kolekti cindron, precipe tabakan
- *knedi* → *knedujo* = vazo, en kiu oni knedas paston
- *bani* → *banujo* = kuvo aŭ simile, en kiu oni banas sin mem aŭ iun alian
- *konservi* → *konservujo* = skatolo, vazo, kesto k.s., en kiu oni konservas ion (ekz. manĝaĵon)
- *trinki* → *trinkujo* = granda longforma ujo (trogo), el kiu bestoj trinkas

UJ havas tre ĝeneralan signifon. Por precizeco oni povas fari kunmetaĵojn kun aliaj radikoj, ekz.: *teskatolo*, *tekruĉo*, *tetaso*, *cigarskatolo*, *cigaredpaketo*, *konservoskatolo*.

Rimarku, ke tio, kio staras antaŭ UJ, ĉiam devige montras enhavon, dum tio, kio staras antaŭ SKATOL, VAZ k.t.p., povas montri jen enhavon, jen materialon, jen ion alian, ekz.: *ladskatolo* = "skatolo el lado", *lignositelo* = "sitelo el ligno", *noktovazo* = "vazo uzata dumnokte por urini", *tirkesto* = "eltirebla kesto". Sed *ladujo* devas esti "ujo por lado", kaj *lignujo* estas nepre "ujo por ligno", dum nek **noktujo** nek **tirujo** havas sencon.

### Kreskaĵo

Ĉe nomo de frukto, bero aŭ floro UJ povas montri kreskaĵon, normale arbon aŭ arbuston, kiu donas tian frukton, beron aŭ floron:

- *pomo* → *pomujo* = pomarbo
- *banano* → *bananujo* = bananplanto
- *vinbero* → *vinberujo* = vin(ber)arbusto
- *rozo* → *rozujo* = rozplanto

Pro la risko de konfuzo kun vazo, kiu enhavas tiajn fruktojn, berojn aŭ florojn, multaj nuntempe preferas vortojn kiel *pomarbo*, *bananplanto*, *tearbedo* k.t.p. Sed la UJ-formoj restas uzeblaj.

### Lando

Ĉe nomo de popolano, UJ ĉiam signifas "la lando de tiu popolo":

- *francoj* → *Francujo* = la lando de la francoj
- *ĉinoj* → *Ĉinujo* = la lando de la ĉinoj
- *somaloj°* → *Somalujo* = la lando de la somaloj

Iafoje oni faras landan aŭ regionan UJ-vorton el alispeca vorto:

- *patro* → *patrujo* = patrolando, hejmlando, origina lando
- *prefekto* → *prefektujo* = regiono administrata de prefekto
- *Esperanto* → *Esperantujo* = Esperantolando, la (imagata) lando de la esperantistoj, la Esperanta mondo (la kongresoj k.t.p.)

En landonomoj oni uzas kiel alternativojn al UJ, ankaŭ la radikon LAND sufiksece (§38.4.1), kaj la neoficialan sufikson I (§39.1.12). La plej multaj landoj havas tamen sensufiksan nomon. Legu pli detale pri nomoj de landoj kaj popoloj en §35.4.

### Ordinara radiko

Kiel ordinara radiko UJ ĉiam montras entenilojn, vazojn, skatolojn k.t.p., neniam kreskaĵojn aŭ landojn:

- *ujo* = ia vazo, skatolo aŭ alia entenilo

## 38.2.30. UL

UL = "persono kun ia karakterizo". Komparu kun IST (§38.2.24) kaj AN (§38.2.4). Tio, kio staras antaŭ UL, ĉiam montras tion, kio karakterizas la personon.

### Ecaj radikoj

Plej ofte oni uzas UL ĉe eca radiko (kiu normale estas A-vorto):

- *bona* → *bonulo* = persono karakterizata de boneco
- *juna* → *junulo* = persono karakterizata de juneco
- *honesta* → *honestulo* = persono honesta laŭ sia karaktero
- *dika* → *dikulo* = persono aparte dika
- *lama* → *lamulo* = persono (daŭre) lama
- *kara* → *karulo* = persono aparte kara por la parolanto
- *fremda* → *fremdulo* = persono de fremda lando, regiono, urbo k.t.p.
- *sankta* → *sanktulo* = persono aparte sankta
- *nigra* → *nigrulo* = homo el la tiel nomata nigra raso, negro
- *blanka* → *blankulo* = homo el la tiel nomata blanka raso

### Alispecaj radikoj

Oni povas uzi UL ankaŭ ĉe aga aŭ alispeca vorto:

- *timi* → *timulo* = persono, kiu ofte timas, timemulo
- *drinki* → *drinkulo* = persono, kiu (tro) ofte drinkas, drinkemulo
- *ŝerci* → *ŝerculo* = persono, kiu ofte ŝercas, ŝercemulo
- *ĝibo* → *ĝibulo* = persono kun karakteriza ĝibo
- *lepro* → *leprulo* = persono malsana je lepro
- *almozo* → *almozulo* = persono, kiu vivtenas sin per almozpetado
- *azeno* → *azenulo* = persono simila al azeno, stultulo
- *miliono* → *milionulo* = persono, kiu posedas miliono(j)n da dolároj/eŭroj/enoj ...
- *granda kapo* → *grandkapulo* = persono kun aparte granda kapo
- *longaj kruroj* → *long(a)krurulo* = persono kun aparte longaj kruroj
- *sen kuraĝo* → *senkuraĝulo* = persono, al kiu mankas kuraĝo
- *kontraŭ* → *kontraŭulo* = persono, kiu daŭre kontraŭas ion aŭ iun certan
- *antaŭ* → *antaŭulo* = persono, kiu ekzistis aŭ agis antaŭe
- *post* → *poste* → *posteulo* = persono, kiu sekvis aŭ sekvos post alia persono (legu pri E kiel ligfinaĵo, §37.3)

- *alia* → *aliulo* = alia persono
- *ĉi tie* → *ĉi-tieulo* = persono, kiu troviĝas ĉi tie

Oni preferas fari kunmetaĵojn kun UL anstataŭ ekz. *viro*, *homo*, *persono* k.t.p. Tiu prefero eĉ estas tiel forta, ke vortoj kiel **timhomo**, **ŝercviro**, **almozpersono** estas rigardataj kiel eraroj, se eblas la saman aferon esprimi per UL.

### Bestoj

Oni ankaŭ regule uzas UL en iaj nomoj de bestospecoj, kvankam ne temas pri personoj:

- *mamo* → *mamuloj* = klaso de bestoj, kiuj mamnutras siajn idojn
- *rampi* → *rampuloj* = reptilioj (kvankam ne ĉiuj reptilioj rampas)
- *araneo* → *araneuloj* = grupo de bestoj, el kiuj araneo estas tipa ekzemplo
- *branko* → *brankuloj* = tiaj bestoj, kiuj spiras per brankoj

### Figura UL

Okaze oni uzas UL figure por plej diversaj aferoj, kiujn oni volas prezenti kvazaŭ personojn, eĉ kreskaĵoj aŭ nevivaĵoj:

- *neĝon boras* → *neĝborulo* = plantospeco, kiu aperas frue printempe, galanto
- *nubojn skrapas* → *nubskrapulo* = treege alta domo, kiu kvazaŭ skrapas la nubojn
- *tri mastoj* → *trimastulo* = ŝipo kun tri mastoj
- *peza kargo* → *pezkargulo* = ŝipo por peza kargo

Ankaŭ IST (§38.2.24) estas iafoje uzata en simila maniero.

### Ne trouzu UL

Ĉe vortoj, kiuj per si mem havas personan signifon, oni ne uzu senbezone UL. Precipe oni atentu pri participoj kun O-finaĵo. O-participo per si mem montras personon (§28.3), kaj tial aldono de UL normale estas eraro. Ne diru do **parolantulo**, **kurintulo**, **konatulo**, sed simple *parolanto*, *kurinto*, *konato*. (Sed *konatulo* en la signifo “konato” fakte jam fariĝis tiel kutima, ke oni tamen devas ĝin toleri kiel idiomaĵon.)

Se oni tamen aldonas UL al participo kun O-finaĵo aŭ al alia persona vorto, tiam oni kreas vorton kun speciala signifo. *Virulo* ne egalas al *viro*, sed signifas “persono karakterizata de vireco” = *vireculo*. *Mortintulo* ne estas simple “mortinta persono” (= *mortinto*), sed signifu “persono kiu similas al mortinto, persono kiu estas kvazaŭ mortinta”. *Konatulo* principe estu “persono karakterizata de konateco” = *famulo*, dum *konato* simple estas “persono konata de iu”. *Instruitulo* [FK.253] estas “homo karakterizata de sia instruiteco” = *klerulo*, *sciencisto*. Ĉe participoj oni tamen nur maloftege vere uzas tiun eblon krei specialan signifon per aldono de UL, kaj la vorto *konatulo* estas plej ofte nur erare uzata anstataŭ *konato*.

### Ordinara radiko

- *ulo* = persono sen ia speciala karakterizo (iafoje kun malŝateta, familiara aŭ ŝerca nuanco)

### Ĉu UL estas vira aŭ sekse neŭtrala?

Laŭ la ĉi-antaŭaj klarigoj la sufiksa radiko UL havas la signifon “persono”. Tio estas sekse neŭtrala signifo. Sed en praktika lingvouzo la afero ne estas tiel klara. En multe-nombro UL estas plej ofte neŭtrala: *saĝuloj* = “saĝaj personoj”, *junulargastejo* = “gastejo por junaj homoj”, *malrapiduloj* = “malrapidaj homoj”. Sed en unu-nombro okazas ofte, ke UL praktike signifas “vira persono”. Oni ekz. tre malofte diras frazojn kiel *ŝi estas belulo*. Multaj eĉ opinias tian frazon erara, kaj diras nepre nur *belulino* pri virino. La lingvo estas ĉi-punkte malklara. Estas normala afero en Esperanto, ke neŭtrala vorto momente kvazaŭ ricevas viran signifon, kiam oni kontrastigas ĝin al ina vorto, ekz. *junulo kaj junulino* = “juna viro kaj juna virino”. En tia kunteksto UL fariĝas praktike vira. Tio estas vortŝpara esprimomaniero. Sed per si mem UL prefere estu neŭtrala. Nur en klara kontrasto kun ina vorto, ĝi povas havi kvazaŭ viran sencon. La malklara signifo de UL estas tamen problemo, kiun finfine nur la libera evoluo de la lingvo povos solvi.

Oni povas starigi la saman demandon pri la sufiksaj radikoj AN, ESTR, ID kaj IST, kaj pri la participaj sufiksoj ANT, INT, ONT, AT, IT kaj OT. Sed ĉe tiuj radikoj ŝajnas pli-malpli klare, ke ili ja estas neŭtralaj, ne viraj, kvankam eble ne ĉiuj konsentas pri tio.

Legu pli pri la seksa signifo de radikoj kaj O-vortoj en §4.3.

## 38.2.31. UM

La sufikso UM ne havas difinitan signifon. Per ĝi oni faras vortojn, kiuj havas ian rilaton al tio, kio staras antaŭ UM. Ĉiun UM-vorton oni devas aparte lerni. Ekzistas tamen kelkaj grupoj de UM-vortoj kun similaj signifoj.

### Agi per io

Multaj UM-verboj signifas “agi en certa maniero per tio, kio staras antaŭ UM”:

- *folio* → *foliumi* = turni la foliojn de libro aŭ gazeto por rapide kaj pase iom legi
- *palpebro* → *palpebrumi* = rapide fermi kaj malfermi la palpebrojn
- *okulo* → *okulumi* = ĵeti avidan, amdeziran rigardon al iu
- *brako* → *brakumi* = ĉirkaŭbraki

### Provizi per io

Iuj UM-verboj signifas “provizi en certa maniero per tio, kio staras antaŭ UM”:

- *aero* → *aerumi* = elmeti al aero, enlasi aeron por freŝigi
- *suno* → *sunumi* = elmeti al la sunradioj
- *sukero* → *sukerumi* = kovri per sukero

- *sapo → sapumi* = kovri aŭ ŝmiri per sapo (= sapi)

Por tiu ĉi signifo oni uzas iafoje la teĥnikan sufikson IZ (§39.1.22).

### Ekzekutado

Grupo de UM-verboj montras manieron de ekzekutado, mortigado:

- *kruco → krucumi* = najli aŭ ligi al kruco por mortigi
- *pendi → pendumi* = pendigi per ŝnuro ĉirkaŭ la kolo por mortigi
- *ŝtono → ŝtonumi* = mortigi per ĵetado de ŝtonoj
- *gaso → gasumi* = mortigi per venena gaso
- *dek → dekumi* = ekzekuti ĉiun dekan homon el grupo por puni la tutan grupon (komparu kun *dekuma*)
- *kvarono → kvaronumi* = ekzekuti per tranĉado en kvar partojn

### Vestaĵparto

Iuj UM-vortoj estas nomo de vestaĵparto aŭ simila afero. Tio, kio staras antaŭ UM montras korpoparton, ĉe kiu la afero troviĝas:

- *kolo → kolumo* [FE.42] = vestaĵparto, kiu ĉirkaŭas la kolon
- *mano → manumo* [FE.42] = la ekstrema ĉemana parto de maniko
- *plando → plandumo* = la plata malsupro de ŝuo
- *dorso → dorsumo* = surdorsa parto de ekz. jako aŭ ĉemizo
- *nazo → nazumo* = speco de okulvitroj, kiuj fiksiĝas pinĉe sur la nazo
- *buŝo → buŝumo* = buŝingo, kiu malhelpas mordadon (uzata ekz. ĉe hundo)
- *hufo → hufumo* = huffero, protekta ferpeco por hufo (ekz. de ĉevalo)

Rimarku, ke *brakumo* ne signifas “maniko”, sed “ĉirkaŭbrakado”, kvankam *brako* estas korpoparto.

### Nombrosistemo

UM estas uzata en matematiko por fari nomojn de nombrosistemoj. Oni metas UM post nombro, kiu montras, kiom da ciferoj uzas la sistemo:

- *du → duuma nombrosistemo* = sistemo kun du ciferoj, binara sistemo
- *dek → dekuma nombrosistemo* = sistemo kun dek ciferoj, decimala sistemo (komparu kun *dekumi*)
- *dek ses → deksesuma nombrosistemo* = sistemo kun dek ses ciferoj

Vidu ankaŭ la neoficialan sufikson ARI (§39.1.5).

### Diversaj UM-vortoj

- *malvarma → malvarmumi* [FE.42] = malsaniĝi je tuso, nazkataro k.t.p. (supoze pro malvarmo)
- *plena → plenumi* [FE.42] = fari plene (taskon, devon k.s.)
- *gusti → gustumi* = senti guston, provi guston
- *aminda → amindumi* = montri sin aminda al iu por kapti ties amon

- *cerbo → cerbumi* = forte kaj pene pensi
- *loto → lotumi* = (dis)doni/premii laŭ decido per lotado
- *alfabeto → alfabetumo* = lernolibro pri skribado kaj legado (per alfabeto)
- *bruli → brulumo* = inflamo
- *komuna → komunumo* = administra distrikto ĉirkaŭ urbo, societo aŭ organizo kunlabora, kunloĝa k.t.p.
- *lakto → laktumo* = laktaspekta semo de fiŝo
- *korto → kortumo* = granda kaj grava juĝejo
- *dekstra → dekstruma* = tia, ke ĝi turniĝas aŭ volviĝas dekstren (horloĝdirekten)
- *proksima → proksimume* = ne ekzakte, ĉirkaŭ
- *somero → somerumi* = pasigi somerajn feriojn en agrabla loko

#### Superfluaj UM

En iuj UM-verboj UM estas superflua, ĉar simpla sensufiksa verboformo (§37.2.4) bone taŭgas, ekz.: *butonumi* = *butoni*, *akvumi* = *akvi*, *salumi* = *sali*, *kuprumi* = *kupri*, *tendumi* = *tendi*. Simplan verbon oni uzu por ago, kiu rekte kaj simple rilatas al signifo de la radiko. UM-verbo taŭgas por alia, pli speciala signifo, kiel ekz. ĉe *foliumi* kaj *okulumi*. Multaj iamaj UM-verboj estas nuntempe uzataj sen UM.

#### Novaj UM-vortoj

Se oni volas krei novan UM-vorton, oni estu tre singarda, ĉar aliaj ĝin eble ne komprenos. UM-vorto, kiu aliĝas al iu el la ĉi-antaŭaj grupoj, pli facile akceptiĝas, dum UM-vorto, kiu ne similas al jam ekzistanta UM-vorto, estas pli malfacile enkondukebla. Ofte oni tamen faras okazan UM-vorton, kiu kompreniĝas pro la kunteksto, kaj kiu poste malaperas.

#### Ordinara radiko

Iafoje UM aperas kiel ordinara radiko kun diversaj improvizaj signifoj:

- *umo* = afero kies nomon oni momente ne memoras, afero stranga aŭ nepriskribebla ...
- *umi* = fari ion nedifineblan, strangan, hontindan ...

## 38.3. Prefiksoj

### 38.3.1. BO

BO = “parenceco pro geedziĝo”. Komparu kun prefikseca DUON (§38.4.1).

BO aperas precipe en la jenaj tri parencovortoj, kaj en la tri respondaj IN-vortoj:

- *patro → via bopatro* = la patro de via edz(in)o
- *filo → via bofilo* = la edzo de via fil(in)o

- *frato → via bofrato* = la frato de via edz(in)o, la edzo de via frat(in)o, la edzo de frat(in)o de via edz(in)o

Ankaŭ la jenaj BO-vortoj (kaj la respondaj IN-formoj) estas eblaj, sed malpli ofte uzataj. Anstataŭe oni uzas normale la simplajn vortojn sen BO:

- *kuzo → via bokuzo* = la edzo de via kuz(in)o, la kuzo de via edz(in)o, la edzo de kuz(in)o de via edz(in)o
- *nevo → via bonevo* = la edzo de via nev(in)o, la nevo de via edz(in)o, la edzo de nev(in)o de via edz(in)o
- *onklo → via boonklo* = la onklo de via edz(in)o, la edzo de via onkl(in)o, la edzo de onkl(in)o de via edz(in)o
- *avo → via boavo* = la avo de via edz(in)o
- *nepo → via bonepo* = la edzo de via nep(in)o
- *parenco → boparenco* = ia pergeedziĝa parenco
- *familiano → bofamiliano* = ia pergeedziĝa familiano

Por "la filo de via duonpatr(in)o el ties antaŭa geedzeco" oni ne uzas *bofrato*, sed *vicfrato*. Vidu la klarigojn pri DUON kaj VIC en parencovortoj (§38.4.1).

Kiam temas pri parenceco pro **du geedzecoj**, oni logike povus uzi vortojn kun duobla BO-prefikso: *via bobofrato* = "la edzo de frat(in)o de via edz(in)o", *via bobokuzo* = "la edzo de kuz(in)o de via edz(in)o", *via bobonevo* = "la edzo de nev(in)o de via edz(in)o", *via boboonklo* = "la edzo de onkl(in)o de via edz(in)o". En la praktiko oni tamen uzas nur simplajn BO-formojn ankaŭ por tiaj signifoj.

En la Biblio aperas ankaŭ la vorto *boedziĝi* pri la kutimo edziĝi al la edzino de frato, kiu mortis sen infanoj: *Envenu al la edzino de via frato, kaj **boedziĝu** kun ŝi kaj naskigu idaron al via frato.* [Gn.38]

BO povas aperi kune kun la prefiksoj GE (§38.3.6) kaj PRA (§38.3.9). La reciproka ordo de tiuj prefiksoj ne gravas por la signifo, sed kutime GE aperas laste: *bogepatroj*, *bogefratoj*, *bopragekuzoj* k.s.

Legu pli pri vortoj por parencoj kaj familianoj en §41.

### 38.3.2. ĈEF

ĈEF = "la plej grava, la plej altranga". Komparu kun ESTR (§38.2.14) kaj la neoficiala prefikso ARĤI/ARKI (§39.2.3). ĈEF montras, ke la posta afero estas la plej grava inter ĉiuj similaj aferoj:

- *episkopo → ĉefepiskopo* [FA1.172] = la plej grava, plej altranga, inter la episkopoj
- *urbo → ĉefurbo* [OV.411] = tiu urbo, kiu estas oficiale difinita kiel la plej grava de la lando, kaj en kiu normale troviĝas la landaj registaro, parlamento k.t.p.
- *parto → ĉefparto* [Gn.2] = la plej grava parto de io
- *redaktisto → ĉefredaktisto* = redaktisto, kiu respondecas pri la enhavo de la redaktata gazeto, revuo k.s.

- *artikolo* → *ĉefartikolo* = la plej grava artikolo de gazeto, ordinare montranta opinion de la eldonisto aŭ ĉefredaktisto
- *strato* → *ĉefstrato* = la plej grava kaj plej granda strato de urbo
- *manĝo* → *ĉefmanĝo* = la plej grava manĝo de la tago

### Ordinara radiko

ĈEF estas tre ofte uzata kiel ordinara radiko:

- *ĉefo* = la plej grava aŭ altranga persono
- *ĉefa* = plej grava, plej altranga, precipa
- *ĉefe* = precipe, antaŭ ĉio

### ĈEF kaj ESTR

ĈEF montras la plej gravan aferon aŭ personon. La sufikso ESTR montras personon, kiu gvidas kaj decidas. Ofte tiu persono, kiu estas plej grava, havas ankaŭ decidopovon, kaj tial oni iafoje povas esprimi la saman aferon ĉu per ESTR-vorto, ĉu per ĈEF-vorto, ekz.: *ĉefredaktoro* (la plej grava redaktoro) ≈ *redakciestro* (estro de redakcio).

ESTR ĉiam montras personon, dum ĈEF kiel prefikso ne montras mem personon: *ĉefurbo* tute ne egalas al *urbestro*. ĈEF kiel memstara O-vorto tamen ĉiam montras personon, kaj tial la memstaraj vortoj *ĉefo* kaj *estro* estas en la praktiko preskaŭ samsignifaj.

## 38.3.3. DIS

DIS = “for en malsamaj aŭ pluraj direktoj, malkunen”. DIS estas uzata nur antaŭ agaj vortoj, kaj ĉiam montras manieron de la ago aŭ rezulton de la ago.

### Movaj vortoj

Ĉe mova vorto DIS montras, ke pluraj aferoj moviĝas for en malsamaj direktoj:

- *iri* → *disiri* = iri for en malsamaj direktoj
- *kuri* → *diskuri* = kuri for en malsamaj direktoj
- *ĵeti* → *disĵeti* = ĵeti for en malsamaj direktoj
- *sendado* → *dissendado* = sendado for en pluraj direktoj

### Jam dis-signifaj vortoj

Ĉe vorto, kiu jam en si mem havas ian disigan signifon, DIS plifortigas tiun signifon:

- *ŝiri* → *disŝiri* = per ŝir(ad)o dividi en pecojn
- *rompi* → *disrompi* = per romp(ad)o dividi en pecojn
- *pecigi* → *dispecigi* = pecigi kaj dismeti
- *haki* → *dishaki* = haki en pecojn
- *vastigo* → *disvastigo* = vastigo en pluraj direktoj

- *de* → *disde* = “de” en formova aŭ malsimileca signifo

La vorto *disde* povas iafoje esti utila anstataŭ *de* rilate al pasiva participo (§12.3.2.4), aŭ anstataŭ *de* rilate al verbo (§12.3.2.1). En *disde* la prefikso DIS escepte aperas antaŭ neaga vorto.

### Kunig-signifaj vortoj

Iafoje oni uzas DIS ĉe vorto kun signifo kuniga, kompaktiga, ferma k.s. DIS tiam forigas la kunigan signifon aldonante anstataŭe disigan signifon. DIS tiam funkcias same kiel MAL:

- *faldi* → *disfaldi* = malfaldi
- *sigeli* → *dissigeli* = malsigeli, rompi sigelon
- *volvi* → *disvolvi* = malvolvi, etendi plata ion volvitan, iom post iom kreskigi aŭ evoluigi

El tiaj DIS-vortoj nur *disvolvi* estas ofta, kaj nur en sia figura signifo “iom post iom kreskigi aŭ evoluigi”. Tia figura *disvolvi* estas akceptebla, sed en aliaj okazoj oni prefere uzu MAL: *malfaldi*, *malsigeli* k.t.p.

### Ordinara radiko

- *disa* = malkuna, dividita, maldensa
- *dise* = malkune, dividite, en malsamaj lokoj aŭ malsamaj direktoj
- *disen* = malkunen, en malsamajn lokojn aŭ malsamajn direktojn
- *disa* → *disigi* = igi disa(j), disdividi → *disiĝi* = iĝi disa(j), disdividiĝi, dismoviĝi
- *disa karno* → *diskarni* aŭ *diskarnigi* = forigi aŭ disŝiri ies karnon
- *disaj membroj* → *dismembrigi* = disdividi laŭ la membroj (*membro* estas ĉi tie aŭ korpa membro, aŭ difinita parto de tutaĵo)

> **Noto:** Oni ankaŭ provis uzi DIS memstare anstataŭ *disen*, precipe en poezio: *La mon’ ruliĝis sur la planko **dis***. (Ekzemplo laŭ *K. Kalocsay*.) Normale oni ne povas tiel uzi DIS.

## 38.3.4. EK

EK = “komenco de ago, subita ago”. EK estas uzata nur ĉe agaj vortoj, kaj ĉiam montras manieron de la ago.

### Komenciĝo

Plej ofte EK montras, ke ago komenciĝas. Ĝi montras la plej unuan momenton de la ago, ofte kun nuanco de subiteco aŭ neatenditeco:

- *labori* → *eklabori* = komenci labori
- *kuri* → *ekkuri* = komenci kuri
- *sidi* → *eksidi* = komenci sidi
- *dormi* → *ekdormi* = komenci dormi, (en)dormiĝi
- *pluvi* → *ekpluvi* = komenci pluvi
- *bruli* → *ekbruli* = komenci bruli (→ *ekbruligi* = igi ekbruli)

- *floro* → *flori* → *ekflori* = komenci flori (pri *ekfloro* vidu "Strecitaj formoj", §37.5)
- *de* → *ekde* = komence de

La vorto *ekde* povas iafoje esti utila anstataŭ *de* rilate al pasiva participo (§12.3.2.4), aŭ anstataŭ *de* rilate al verbo (§12.3.2.1). En *ekde* la prefikso EK escepte aperas antaŭ neaga vorto.

Ankaŭ la sufikso IĜ povas en iuj okazoj montri komencon de ago (§30.9): *sidiĝi*, *estiĝi* k.s. EK montras pli subitan, pli rapidan komencon ol IĜ.

### Subiteco

Iafoje EK montras subitan agon, kiu daŭras nur momenteton. Tiam temas ne nur pri la komenco, sed pri la tuta ago:

- *fulmi* → *ekfulmi* = momente kaj subite fulmi
- *brili* → *ekbrili* = subite kaj momente ĵeti brilon
- *bati* → *ekbati* = fari unu subitan baton
- *ridi* → *ekridi* = subite ridi (dum momento)
- *rigardo* → *ekrigardo* = rapida subita rigardo

### Ordinara radiko

EK estas ofte uzata kiel ekkria vorteto (§18.2), aŭ kiel ordinara radiko:

- *ek!* = komencu (tuj)!, ni (tuj) komencu!, k.s.
- *Ek al li!* = Venu! Ni kaptu lin!, k.s.
- *eki* = komenciĝi
- *ekigi* = komenci

## 38.3.5. EKS

EKS = "iam antaŭe estinta, ne plu oficanta, ne plu tia". EKS estas uzata precipe ĉe profesioj kaj aliaj homaj roloj, sed iafoje ankaŭ ĉe alispecaj vortoj:

- *reĝo* → *eksreĝo* = persono, kiu antaŭe estis reĝo, abdikinta reĝo
- *ministro* → *eksministro* = persono, kiu antaŭe estis ministro
- *edzo* → *eksedzo* = persono, kiu antaŭe estis edzo
- *(ge)edziĝi* → *eks(ge)edziĝi* = rompi, ĉesigi (ge)edzecon
- *amiko* → *eksamiko* = persono, kiu antaŭe estis amiko
- *kolonio* → *ekskolonio* = loko, kiu iam estis kolonio, sed kiu sendependiĝis
- *moda* → *eksmoda* = ne plu moda

### Kastrita besto

Ĉe besta vorto EKS havas la specialan signifon "kastrita":

- *bovo* → *eksbovo* = kastrita bovo
- *virkato* → *eksvirkato* = kastrita virkato
- *ĉevalino* → *eksĉevalino* = kastrita ĉevalino

Vidu ankaŭ la neoficialan sufikson UK (§39.1.36).

### Ordinara radiko

- *eksa* = iama, ne plu estanta
- *eksigi* = forigi (ekz. de profesio), abdikigi, ĉesigi
- *eksiĝi* = abdiki, deposteniĝi, forlasi postenon, laboron aŭ okupon

Kelkaj uzas EKS kiel ekkrian vorteton (§18.2): *Eks pri tiu problemo!* ≈ "Nun tiu problemo ne plu okazos/ne plu ĝenos nin!". *Eks pri li!* ≈ "Nun li ne plu aperos. Nun li ne plu ĝenos nin."

## 38.3.6. GE

GE = "ambaŭ seksoj". GE estas uzata ĉe viraj kaj sekse neŭtralaj vortoj por doni al ili ambaŭseksan signifon.

Legu ankaŭ pri la sufikso IN en §38.2.20, kaj pri prefikseca VIR en §38.4.1. GE povas aperi kune kun la prefiksoj BO kaj PRA (§38.3.1).

### Paroj

GE povas montri paron:

- *patro* → *gepatroj* = patro kaj patrino (de komunaj infanoj)
- *edzo* → *geedzoj* = edzo kaj lia edzino
- *fianĉo* → *gefianĉoj* = fianĉino kaj ŝia fianĉo
- *mastro* → *gemastroj* = mastro kaj mastrino, kiuj estas paro
- *cikonio* → *gecikonioj* = cikoniino kaj vira cikonio, kiuj estas paro
- *doktoro* → *gedoktoroj* = doktoro kaj ties edz(in)o

*Gedoktoroj* logike devus esti paro, en kiu ambaŭ estas doktoroj. Tial oni nuntempe apenaŭ uzas vortojn kiel *gedoktoroj* pri paro.

### Grupo de parencoj

GE ankaŭ estas uzata ĉe parencovortoj por montri grupon de parencoj el ambaŭ seksoj:

- *frato* → *gefratoj* = fratino(j) kaj frato(j)
- *filo* → *gefiloj* = filo(j) kaj filino(j)
- *nevo* → *genevoj* = nevino(j) kaj nevo(j)

### Ambaŭseksa grupo

GE estas ankaŭ uzata pli ĝenerale por montri, ke ambaŭ seksoj ĉeestas en grupo:

- *knabo* → *geknaboj* = kaj knabino(j) kaj knabo(j)
- *lernanto* → *gelernantoj* = kaj viraj kaj inaj lernantoj
- *samideano* → *gesamideanoj* = kaj inaj kaj viraj samideanoj
- *doktoro* → *gedoktoroj* = kaj viraj kaj inaj doktoroj
- *homo* → *gehomoj* = homoj el ambaŭ seksoj, kaj homino(j) kaj virhomo(j)

Se vorto per si mem estas neŭtrala, oni ne bezonas aldoni GE, krom se oni volas aparte emfazi, ke ambaŭ seksoj ĉeestas. Normale oni diru simple *lernantoj*, *samideanoj*, *doktoroj* kaj *homoj*. Legu pli pri la seksa signifo de radikoj kaj O-vortoj en §4.3.

### Rilatas al ambaŭ seksoj

Malofte GE aperas antaŭ io, kio mem ne povas havi sekson. Tia GE-vorto montras, ke io koncernas ambaŭ seksojn, ofte kun ŝerca nuanco. Tiaj vortoj estas nenormalaj, kaj oni ne uzu ilin tro multe:

- *lernejo → gelernejo* = lernejo por ambaŭ seksoj
- *sola → gesolaj* = solaj kiel paro

### Modernaj komprenoj pri seksa varieco

Al la konsideroj pri la lingva esprimado de sekso aldoniĝis lastatempe (eble ekde la jaro 2010) tio, ke iuj homoj identiĝas kiel sekse neduumaj, do nek kiel viroj, nek kiel virinoj (aŭ eble kiel sekse ambiguaj). Tial povas estiĝi duboj pri tio, kiel interpreti la prefikson GE, kies tradicia signifo "ambaŭ seksoj" antaŭsupozas la ekziston de precize du seksoj. Sub ĉi tiaj ŝanĝiĝintaj cirkonstancoj, la interpreto de GE kiel "pli ol unu sekso" ŝajnas esti kiel eble plej konforma kun la tradicia kaj Fundamenta signifo de GE: *Mi renkontiĝos kun du **geamikoj**. Temas pri unu amikino kaj unu neduuma amiko.*

Legu ankaŭ pri la proponita neduuma sufikso IP° en §39.1.18 kaj la sekse neŭtrala unu-nombra pronomo *ri*° (§11.5).

### Unu-nombraj GE-vortoj

GE-vorto kun O-finaĵo tradicie povas esti nur multe-nombra, ĉar devas esti pli ol unu persono por ke ambaŭ seksoj (aŭ pli ol unu sekso) povu ĉeesti. Tamen delonge ekzistas eksperimenta uzado de GE en unu-nombraj vortoj kun la signifo "iu ajn sekso". Tia uzo de GE komencis plioftiĝi en la pasintaj 20 ĝis 30 jaroj. Laŭ tiu uzmaniero de GE oni povas fari vortojn kiel *gepatro* = "patro aŭ patrino (aŭ neduuma persono en tia parenco-rilato)", *geedzo* = "edzino aŭ edzo (aŭ neduuma persono en tia rilato)".

Fakte jam en la tradicia lingvouzo ekzistas kuntekstoj, en kiuj GE praktike alprenas tian signifon, ekzemple en demando kiel *Kiom da gefratoj vi havas?*. La demandanto ne scias, ĉu la demandato havas gefratojn de pli ol unu sekso, kaj tamen ankaŭ laŭ la tradicia lingvouzo oni povas uzi la vorton *gefratoj* en tiaj okazoj. Do praktike la tradicia signifo de GE ne ĉiam estas "ambaŭ seksoj", sed povas vastiĝi al "ambaŭ seksoj aŭ iu ajn sekso" en kunteksto, en kiu estas klare, ke la parolanto ne scias la sekson de la priparolataj personoj.

Ĉar la tradicia lingvouzo jam permesas la uzon de GE por grupo de personoj de nekonata sekso, oni povas argumenti, ke la vastigo de GE al kuntekstoj, en kiuj temas pri unu sola persono de nekonata sekso, ne estas drasta modifo de la uzmaniero de GE. Laŭ ĉi tiu argumento estas eble pravigi uzojn kiel la sekva: *Ĉi tiun permeson devas subskribi almenaŭ unu gepatro de la infano.* Se oni jam akceptas tian unu-nombran uzon de GE, ne plu estas granda paŝo

ĝenerale permesi GE kun la signifo "iu ajn sekso", eĉ kiam la sekso de la priparolata persono estas konata, sed kiam la parolanto ial ne volas mencii la sekson, aŭ kiam temas pri neduuma persono.

Tia ŝanĝo de la origina senco de GE tamen ne estas senproblema. Vorto kiel *gefiloj* tradicie estas komprenata kiel duseksa grupo (almenaŭ unu filo kaj almenaŭ unu filino). Sed la novstila *gefiloj*, kiu simple estas la multe-nombra formo de *gefilo*, estas sekse neŭtrala. En tia grupo eble estas nur filinoj, aŭ eble nur filoj. Tia eksperimenta uzo, se konsekvence aplikata, do ne nur enkondukas novan manieron uzi GE, sed ankaŭ kaŭzas ŝanĝon de la signifo de ĉiuj ĝisnunaj vortoj kun GE.

Krome, laŭ la tradicia signifo de GE, GE-vorto kun alia finaĵo ol O montras nepre pli ol unu, ekz.: *gepatra decido (pri infano)* = "decido de ambaŭ gepatroj (pri infano)". Se temus pri decido de nur unu el la gepatroj, oni tradicie dirus *patrina decido* aŭ *patra decido* (aŭ *decido de unu el la gepatroj*). Sed se oni konsekvence aplikas la proponon uzi vortojn kiel *gepatro* en sekse neŭtrala maniero, tio kondukas al signifoŝanĝo ankaŭ ĉe vortoj kiel *gepatra*, kiu tiam ankaŭ povas rilati al nur unu el la gepatroj: Ekzemple *gepatra decido* tiam povas signifi "decido de unu el la gepatroj".

Oni povas argumenti, ke la ŝanĝiĝinta rolo de sekso en modernaj homaj socioj igis sekse neŭtralajn vortojn pli urĝe bezonataj ol en antaŭaj epokoj. Unuflanke malpligraviĝis sekso en sociaj rilatoj, tiel ke ofte ne estas bezonate mencii la sekson de persono. Aliflanke kreskis la videbliĝo de neduumaj homoj. Tial estas eble argumenti, ke Esperanto nepre bezonas sekse neŭtralajn alternativojn al paroj kiel *patro/patrino*, *frato/fratino*, *filo/filino* kaj *edzo/edzino*.

Kelkaj proponas anstataŭe ekuzi tute novajn sekse neŭtralajn vortojn, ekz. *parento*° (§4.3) por "patro/patrino". Tiu aliro necesigas enkonduki ĉirkaŭ dudek novajn sekse neŭtralajn radikojn, komence apenaŭ vaste konatajn, kio kondukas al malpli efika komunikado. Pro tio, ke GE jam tradicie povas laŭkuntekste alpreni la signifon "iu ajn sekso", ŝajnas pli simple vastigi la uzadon de ĉi tiu signifo de GE por formi sekse neŭtralajn vortojn kiel *gepatro*, *gefrato*, *gefilo* kaj *geedzo*, kiuj estas pli rekte kompreneblaj ol tute nove proponataj vortoj aparte lernendaj. Tio verŝajne klarigas, kial la nova uzmaniero de GE plioftiĝis en la pasintaj jardekoj.

Oni atentu, ke la nova uzmaniero de GE estas tute nebezonata ĉe unu-nombraj O-vortoj, kiuj estas sendube sekse neŭtralaj, kiel *homo* kaj *infano* (§4.3). Oni do ne uzu **gehomo** aŭ **geinfano**. La multe-nombraj formoj *gehomoj* (viraj kaj inaj homoj), *geinfanoj* (viraj kaj inaj infanoj) tamen estas tute eblaj, eĉ se relative malofte bezonataj (nur kiam oni volas aparte atentigi pri ĉeesto de ambaŭ seksoj).

Vidu ankaŭ la sufikson IĈ° (§39.1.13).

### Ordinara radiko

- *geo* = paro (vira kaj ina homoj aŭ bestoj)
- *gea* = rilata al ambaŭ seksoj

Praktike oni tre malofte uzas GE kiel ordinaran radikon.

### 38.3.7. MAL

MAL = "la rekte kontraŭa ideo". MAL estas uzebla nur ĉe vortoj, por kiuj ekzistas rekta kontraŭo. MAL ŝanĝas la signifon de tia vorto al la rekta kontraŭo.

#### Ecaj vortoj

MAL estas plej ofte uzata ĉe vortoj kun eca, kvalita aŭ grada signifo:

- *bona* → *malbona*
- *granda* → *malgranda*
- *feliĉa* → *malfeliĉa*
- *proksima* → *malproksima*
- *riĉa* → *malriĉa*
- *agrabla* → *malagrabla*
- *sana* → *malsana*
- *frua* → *malfrua*
- *laborema* → *mallaborema*
- *moralo* → *morala* → *malmorala* = kontraŭa al la moralo
- *graso* → *grasa* → *malgrasa* = havanta malmulte da graso
- *kiel* → *malkiel*
- *pli* → *malpli*
- *plej* → *malplej*
- *tro* → *maltro*

Atentu pri la elparolo de vortoj kiel *malpli*, *malplej* kaj *maltro*. Ili havu akcenton je la antaŭlasta vokalo (§2.1): ***má**lpli*, ***má**lplej*, ***má**ltro*. Legu pli pri la elparolado de MAL-vortoj en §2.2.

#### Abstraktaj vortoj

MAL estas uzebla ankaŭ ĉe agaj, poziciaj, direktaj kaj aliaj abstraktaj vortoj:

- *fermi* → *malfermi*
- *helpi* → *malhelpi*
- *ami* → *malami*
- *ŝlosi* → *malŝlosi*
- *laŭdi* → *mallaŭdi*
- *sukcesi* → *malsukcesi*
- *ŝtopi* → *malŝtopi*
- *aliĝi* → *malaliĝi*
- *kodo* → *kodi* → *malkodi* = retransskribi koditan tekston en la originan formon
- *antaŭ* → *malantaŭ*

- *supre → malsupre*
- *dekstro → maldekstro*
- *antaŭo → malantaŭo*
- *antaŭen → malantaŭen*
- *simetrio → malsimetrio*
- *konkordo → malkonkordo*
- *ordo → malordo*

### Konkretaj vortoj

MAL estas uzebla ankaŭ ĉe iaj vortoj kun konkreta signifo, por kiu ekzistas rekta kontraŭo:

- *amiko → malamiko*
- *lumo → mallumo*

### Diferenco inter MAL kaj *ne*

Oni povas iafoje heziti inter MAL kaj *ne*. *Ne* montras foreston, mankon de io, dum MAL montras ĉeeston de la kontraŭa ideo. Ofte ambaŭ estas uzeblaj, sed kun iom malsamaj signifoj. Iafoje estas nur nuanca diferenco. MAL estas iafoje uzata kiel pli forta *ne*:

- *laŭdi* = diri, kiel bona io estas
- *ne laŭdi* = ne diri, kiel bona io estas
- *mallaŭdi* = diri, kiel malbona io estas
- *ne mallaŭdi* = ne diri, kiel malbona io estas
- *utila* = tia, ke ĝi kreas bonon aŭ profiton
- *neutila* = tia, ke ĝi ne kreas bonon aŭ profiton
- *malutila* = tia, ke ĝi kreas malbonon aŭ malprofiton
- *ne malutila* = tia, ke ĝi ne kreas malbonon aŭ malprofiton
- *afabla* = kondutanta kun agrablaj vortoj kaj agoj
- *neafabla* = kondutanta sen agrablaj vortoj kaj agoj
- *malafabla* = kondutanta kun malagrablaj vortoj kaj agoj
- *ne malafabla* = ne kondutanta kun malagrablaj vortoj kaj agoj
- *sukcesa* = tia, ke ĝi donas kontentigan, bonan rezulton
- *ne sukcesa* = tia, ke ĝi donas ne kontentigan, mankohavan rezulton (≈ sensukcesa)
- *malsukcesa* = tia, ke ĝi donas malkontentigan, malbonan rezulton
- *ne malsukcesa* = tia, ke ĝi ne donas malkontentigan, malbonan rezulton
- *amiko* = persono, al kiu oni sentas simpation aŭ amon
- *neamiko* (malofta vorto) = persono, al kiu oni sentas nek amon/simpation, nek malamon/malsimpation
- *malamiko* = persono, al kiu oni sentas malsimpation aŭ malamon

Vidu pli da ekzemploj kun prefikseca *ne* (§38.4.3).

Ĉe iaj agaj vortoj *ne* montras simple, ke la ago ne okazas, dum MAL esprimas la pli emfazan signifon, ke la ago ne okazas, kvankam ĝi normale devus okazi:

- *dormi* → *maldormi* = resti sendorma, kiam oni normale dormus: *Oni decidis, ke en la venonta nokto unu el la maljunaj sinjorinoj de la kortego **maldormos** ĉe la reĝidino, por vidi, ĉu tio estis efektiva sonĝo, aŭ kio alia ĝi estas.* FA1.10
- *havi* → *malhavi* = ne havi, dum oni sentas, ke oni devus havi

## Evitado de MAL

Ĉe iaj vortoj kun tre speciala signifo oni evitas uzi MAL, kvankam logike tio bone eblus. Oni ekz. malofte aŭdas vortojn kiel *malgiganta*, *malenvii*, *malŝuldo*, *malpedanto* k.a. Sed iafoje ankaŭ malkutimaj vortoj povas esti dezirataj, se oni volas ĝuste malkutime esprimi sin.

*Kaj kiam en la **malmaten'***
*La suno **malaŭroras**,*
***Malvek' maliras** kun **malpen'***
*Kaj oni **maldeĵoras***

fragmento el *Insulo de Fetiĉuloj* de *William Auld*

## Ne ĉiuj maloj havas MAL

Rekte kontraŭa signifo ne ĉiam esprimiĝas per MAL. Ekzistas multegaj kontraŭaj vortparoj sen tiu prefikso, ekz.: *tago – nokto*, *fini – komenci*, *nigra – blanka*, *forgesi – memori*, *trovi – perdi*, *paco – milito*, *pozitiva – negativa*, *nordo – sudo*, *oriento – okcidento*, *interna – ekstera*, *sur – sub*, *al – de*, *kun – sen*, *ĉio – nenio*, *jes – ne*, *plus – minus* k.t.p.

## Alternativoj al MAL-vortoj

Por multaj MAL-vortoj oni kreis nekunmetitan alternativon. Kelkaj tiaj MAL-alternativoj fariĝis oftaj, dum aliaj aperas precipe en poezio k.s. Ankoraŭ aliaj preskaŭ neniam estas uzataj. Iafoje okazas, ke tia MAL-alternativo evoluas for de la MAL-vorto, kaj ricevas specialan signifon.

Ne regas klara interkonsento pri la uzindeco de tiaj MAL-alternativoj, precipe pri tiuj, kiuj ne ricevis specialan signifon. Kelkaj opinias, ke tiaj vortoj estas ĝenerale evitindaj, dum aliaj trovas ilin akcepteblaj aŭ eĉ uzindaj, almenaŭ en certaj kuntekstoj kaj por certaj lingvaj stiloj. Ĉiuokaze oni ne provu tute forigi la prefikson MAL per tiaj MAL-alternativoj.

Jen kelkaj ekzemploj:

- *trista* (= *malgaja*, *malĝoja*) – ofte uzata
- *kurta* (= *mallonga*) – sufiĉe ofta en literatura (precipe poezia) lingvaĵo kaj en kelkaj teĥnikaj kunmetaĵoj (*kurtonda radio*); krome relative malofta

- *frida* (= *malvarma*) – sufiĉe ofta en literatura (precipe poezia) lingvaĵo kaj en kelkaj kunmetaĵoj (*fridujo*, *fridvagono*); krome relative malofta
- *olda* (= *maljuna*) – ne malofta, precipe en literatura lingvaĵo
- *liva* (= *maldekstra*) – iafoje uzata; povas esti tre utila, kiam oni devas rapide aŭ ripete doni instrukciojn pri dekstro kaj maldekstro
- *dura* (= *malmola*) – sufiĉe ofta en teĥnika lingvaĵo; ricevas ofte iom specialan figuran signifon (*dura vivo* = "malfacila vivo"); ekster la teĥnika lingvaĵo relative malofta en nefigura uzo
- *lanta* (= *malrapida*) – sufiĉe ofta en poezia lingvaĵo; malofta ekster literaturo
- *leĝera* (= *malpeza*) – ekhavis specialajn figurajn signifojn (*leĝera literaturo* = "malserioza, senprofunda literaturo", *leĝera infanterio* = "facile movebla infanterio kun relative malpezaj armiloj"); por efektiva malpezeco oni uzas preskaŭ nur *malpeza*
- *turpa* (= *malbela*) – tre malofte uzata
- **dificila*°* (= *malfacila*) – uzata nur de ekstremistoj

Eĉ se iu MAL-alternativa estas taŭga por certaj situacioj, la responda MAL-vorto ĉiam restas tute bona kaj uzinda. Oni ekz. normale uzu *maldekstra*. Nur en specialaj okazoj, kiam vere utilas, oni uzu la alternativon *liva*.

### Ordinara radiko

MAL povas ankaŭ esti ordinara radiko:

- *malo* = rekte kontraŭa ideo (*la **malo** de "granda" estas "malgranda"*)
- *male* = tute kontraŭe

## 38.3.8. MIS

MIS = "erareco, malĝusteco, malboneco". MIS ĉiam montras manieron aŭ econ de tio, kio staras poste. (La prefikso MIS estis oficialigita en 1929.)

- *kalkuli* → *miskalkuli* = kalkuli erare
- *kompreni* → *miskompreni* = kompreni erare
- *skribi* → *misskribi* = skribi erare
- *direkti* → *misdirekti* = montri aŭ gvidi en malĝustan direkton
- *akuzi* → *misakuzi* = akuzi malprave, erare
- *korekti* → *miskorekti* = provi korekti kaŭzante erarecon
- *paŝi* → *mispaŝi* = fari eraran paŝon
- *uzi* → *misuzi* = uzi en malbona aŭ malĝusta maniero
- *trakti* → *mistrakti* = trakti malbone
- *faro* → *misfaro* = malbona faro
- *formo* → *misformo* = erara, malbona formo
- *formi* → *misformi* = doni malĝustan, malbonan formon al io

### Ordinara radiko

- *misa* = erara, malbona, malĝusta
- *misi* = erari, maltrafi

### MIS kaj MAL

Ne konfuzu MIS kun MAL (§38.3.7). MIS ne ŝanĝas la bazan signifon de vorto, sed nur aldonas la ideon de erareco aŭ malboneco. MAL komplete ŝanĝas la signifon en la kontraŭon:

- *laŭdi* = diri, kiel bona io estas
- *mislaŭdi* = erare diri, ke io estas bona, dum ĝi fakte estas malbona
- *mallaŭdi* = diri, kiel malbona io estas
- *mismallaŭdi* = erare diri, ke io estas malbona, dum ĝi fakte estas bona

## 38.3.9. PRA

PRA = "antaŭ tre longa tempo, primitiva". PRA montras, ke tio, kio staras poste estas tempe malproksima:

- *homo* → *prahomo* = plej unua kaj primitiva speco de homo
- *arbaro* → *praarbaro* = primitiva, netuŝita arbaro, ekzistanta de nememorebla tempo
- *tempo* → *pratempo* = la komenca tempo de la homaro aŭ de la mondo
- *eksplodo* → *la Praeksplodo* = nomo de tiu grandega eksploda ekspansio, per kiu kreiĝis la universo laŭ moderna kosmologio
- *tipo* → *pratipo* = unua, ideala, originala, plej frua tipo, prototipo
- *peko* → *prapeko* = la origina peko de Adamo kaj Evo (laŭ Kristanismo)

Iom specialan signifon havas PRA en la vorto *praantaŭlasta* = "antaŭa al la antaŭlasta". Simile eblus uzi PRA ĉe *antaŭhieraŭ* kaj *postmorgaŭ* (§14.2.4).

### Ĉe parencovortoj

Ĉe iuj parencovortoj PRA havas specialan signifon.

Ĉe *av(in)o*, *nep(in)o*, *onkl(in)o* kaj *nev(in)o* PRA montras parencecon je unu generacio pli malproksiman (antaŭe aŭ poste en la tempo). Oni povas uzi pli ol unu PRA por montri eĉ pli malproksimajn parencojn, unu PRA por ĉiu generacio:

- *avo* → *via praavo* = la patro de via av(in)o
- *avo* → *via prapraavo* = la patro de via praav(in)o
- *avo* → *via praprapraavo* = la patro de via prapraav(in)o
- *nepo* → *via pranepo* = la filo de via nep(in)o
- *nepo* → *via prapranepo* = la nepo de via nep(in)o
- *onklo* → *via praonklo* = la frato de via av(in)o
- *onklo* → *via prapraonklo* = la frato de via praav(in)o
- *nevo* → *via pranevo* = la filo de via nev(in)o

- *nevo* → *via prapranevo* = la nepo de via nev(in)o

  **Noto:** En vortoj kun multaj PRA estus penseble uzi nur unu PRA post nombrovorto, kiu montras, pri kiom da generacioj temas: *tripraavo* = *pra-pra-pra-avo*, *kvarpraavino* = *pra-pra-pra-pra-avino*. Tio estas tamen ankoraŭ neuzata.

Ĉe la parencovortoj *patr(in)o* kaj *fil(in)o* PRA montras malproksiman parencecon plurajn aŭ multajn generaciojn antaŭe aŭ poste:

- *patro* → *prapatro* = malproksima vira parenco de kiu iu devenas, efektiva aŭ imagata fondinto de popolo, tribo aŭ familio
- *filo* → *prafilo* = malproksima vira parenco, kiu devenas de certa persono

Ofte oni uzas *prapatroj* kaj *prafiloj* (kun J-finaĵo) ĝenerale pri ies antaŭuloj kaj posteuloj, ofte eĉ sen seksa distingo.

Ĉe parencovortoj PRA povas aperi kune kun la prefiksoj BO kaj GE (§38.3.1).

Legu pli pri vortoj por parencoj kaj familianoj en §41.

### Ordinara radiko

- *praa* = ekzistinta antaŭ tre longe, primitiva, antaŭhistoria

## 38.3.10. RE

RE = "veni aŭ meti denove en la saman lokon kiel antaŭe; denove fari aŭ fariĝi tia kiel antaŭe; fari aŭ okazi ankoraŭ unu fojon en sama aŭ alia maniero". Komparu kun la neoficiala prefikso RETRO (§39.2.22). RE estas uzata nur ĉe agaj vortoj, kaj ĉiam montras manieron de la ago:

- *veni* → *reveni* = veni denove al loko, kie oni estis antaŭe
- *doni* → *redoni* = doni ion al tiu, kiu antaŭe havis tion
- *pagi* → *repagi* = pagi ion al tiu, kiu antaŭe posedis tion
- *saluti* → *resaluti* = respondi saluton per saluto
- *brilo* → *rebrilo* = brila speguliĝo
- *bonigi* → *rebonigi* = denove bonigi ion, kio malboniĝis
- *novigi* → *renovigi* = doni al io novan formon, ripari ion tiel ke ĝi fariĝas kvazaŭ nova
- *saniĝi* → *resaniĝi* = fariĝi denove sana post malsanado
- *naskiĝo* → *renaskiĝo* = la ago denove naskiĝi (efektive aŭ figure)
- *legi* → *relegi* = legi la saman aferon ankoraŭ unu fojon
- *diri* → *rediri* = diri denove la saman aferon, diri responde
- *vido* → *revido* = la ago denove vidi ion, kion oni antaŭe vidis
- *trovi* → *retrovi* = trovi tion, kion oni perdis
- *formi* → *reformi* = doni novan formon al io, provi rekrei la originan formon (legu ankaŭ pri *reformo*, §37.5)
- *koni* → *rekoni* = vidi ion kaj rimarki ke oni jam konas ĝin, agnoski, konfesi la valoron de io
- *turni* → *returni* = turni denove en la antaŭan (kontraŭan) direkton

- *porti* → *reporti* = porti tien kie io jam antaŭe estis, alporti revenante

### Nelogikaj RE-vortoj

Iuj RE-vortoj ekestis pro influo de nacilingvaj vortoj, kaj havas nelogikan signifon. Ekz. *reprezenti* ordinare ne signifas "prezenti denove", sed "agi anstataŭ iu, en ies nomo". *Reciti* ne signifas "citi denove", sed "parkere laŭtlegi". *Resumi* ne estas "denove sumi", sed "koncize esprimi la esencon". Tiujn, kaj aliajn vortojn, oni nun normale rigardas kiel nekunmetitajn (faritajn el la radikoj REPREZENT, RECIT kaj RESUM). Se oni volas uzi ĉi tian vorton en ĝia logika signifo, oni eble elparolu kun distingiga kromakcento (§2.2) je la prefikso RE: *réprezé**nti***, *récí**ti***, *résú**mi***. Skribe oni povas uzi dividostrekon: *re-prezenti*, *re-citi*, *re-sumi*.

*Returni* kaj precipe *returna* kaj *returne* estis antaŭe uzataj ankaŭ pri reirado kaj redonado, pro influo de nacilingvaj vortoj: *Neniam li alportas* ***returne*** [= reen] *tion, kion li prenis!* FA3.2 *Sur la* ***returna*** [= reira] *vojo li renkontis du lernejkamaradojn.* FA1.138 Nun oni uzas tiujn vortojn nur kiam temas pri efektiva turnado.

### Ordinara radiko

- *ree* = denove, ankoraŭ unu fojon
- *reen* = al la antaŭa loko denove (legu pri la N-finaĵo en *reen*, §12.2.5)

Oni ankaŭ provis uzi RE memstare kiel vorteton anstataŭ *ree* aŭ *reen*, precipe en poezio:

> *Maro, zorga dommastrino,*
> *faldas* ***re*** *kaj* ***re****, sen fino,*
> *susure silkajn ondojn.*
>
> poemeto de G. E. Maŭra (= *Gaston Waringhien*)

Normale oni ne povas tiel uzi RE.

## 38.4. Afiksecaj elementoj

Iuj lingvoelementoj, kiujn oni ordinare ne nomas afiksoj, estas tamen uzataj en la vortfarado en ia speciala maniero, laŭ iaj specialaj reguloj. Preskaŭ ĉiam temas baze pri kunmetado laŭ la ordinaraj principoj de kombinoj (§37.3) kaj frazetvortoj (§37.4), sed kun ia aldona specialaĵo. Tiajn elementojn oni povas nomi afiksecaj. Aliaj elementoj aperas tiel oftege en kunmetaĵoj, ke ankaŭ ili ŝajnas esti afiksoj, kvankam ili fakte plene sekvas la ordinarajn vortfarajn regulojn. Ankaŭ tiajn elementojn oni povas nomi afiksecaj.

### 38.4.1. Afiksecaj radikoj kaj kunmetaĵoj

#### AM

AM estas iafoje uzata sufiksece simile al la sufikso EM (§38.2.11), kiam ne temas pri ago: *bestama*, *muzikama*, *gastama*.

### BIT

La radiko BIT (*bito* = “duuma cifero, 0 aŭ 1”) estas pli kaj pli ofte uzata prefiksece por montri, ke io estas elektronika kaj cifereca: *bitlibro* = “elektronika/cifereca libro (legebla per elektronika legaparato aŭ per komputilo)”, *bitlegilo* = “ilo por legi bitlibrojn, bitgazetojn k.s.”, *bitbildo* = “cifereca bildo”, *bitmon(er)o* = “cifereca mon(er)o”. Komparu kun prefikseca RET.

### FIN

FIN estas ofte uzata prefiksece por montri ĝisfinecon de ago anstataŭ prefikseca *el* (§38.4.2): *finkanti*, *finfari*, *finmanĝi*.

### FUŜ

Prefikseca FUŜ montras malbonege faritan (artan aŭ metian) agon. Oni tiel uzas FUŜ precipe ĉe vortoj por ago, sed ankaŭ ĉe vortoj por aganto aŭ rezulto de ago: *kuiri* → *fuŝkuiri*, *fuŝkuiristo*, *fuŝkuiraĵo*; *pentri* → *fuŝpentri*, *fuŝpentristo*, *fuŝpentraĵo*; *verki* → *fuŝverki*, *fuŝverkisto*, *fuŝverk(aĵ)o*; *bindi* → *fuŝbindi*, *fuŝbindisto*, *fuŝbind(aĵ)o*; *aktoro* → *fuŝaktoro*, *fuŝaktori*. Komparu kun la prefikso MIS (§38.3.8).

### HAV, PLEN, RIĈ

La radikoj HAV, PLEN kaj RIĈ estas uzeblaj sufiksece por precizigi la signifon de A-vorto: *barba* → *barbhava*, *trua* → *truhava*, *manka* → *mankohava*, *ama* → *amoplena*, *brua* → *bruoplena*, *flora* → *florplena*, *fuma* → *fumoplena*, *ora* → *ororiĉa*, *herba* → *herbriĉa*, *senta* → *sentriĉa*. Simpla A-vorto havas ofte tre flekseblan signifon (§37.2.2). Normale la kunteksto precizigas, sed iafoje preciziga aldono de HAV, PLEN, RIĈ (aŭ alia radiko) povas esti utila. Vidu ankaŭ la neoficialan sufikson OZ (§39.1.33).

### KELK

KELK estas uzata afiksece ĉe nombraj vortetoj (§23.1.1).

Prefikseca KELK montras multobligon per nedifinita sed ne granda nombro (pli ol unu): *kelkdek homaj voĵoj*[M.199] = “kelkaj dekoj da homaj voĉojj ”, *kelkcent* = “kelkaj centoj”, *kelkmil* = “kelkaj miloj”. Atentu pri la akcento: *kélkcent*, *kélkmil*. KELK ne estas vorteto, sed radiko. Tial ne eblas disskribi tiajn vortojn. Ne skribu **kelk dek**, **kelk mil**, sed *kelkdek*, *kelkmil*. Ĉiam eblas anstataŭe uzi *kelkaj dekoj*, *kelkaj miloj* k.t.p.

Sufikseca KELK montras aldonon de nedifinita nombro (pli ol unu, malpli ol dek): *dekkelke da libroj*[M.119] = “dek kaj kelkaj libroj”, *tridekkelk-jara*[M.83] = “havanta tridek kaj kelkajn jarojn”. Tia uzo tamen estas malofta nuntempe. Atentu, ke *kelk* ne estas nombra vorteto. Tial ne eblas **dudek kelk homoj**, **cent kelk eŭroj** k.s. Oni uzu *dudek kaj kelkaj homoj*, *cent kaj kelkaj eŭroj* ktp, aŭ *dudek kaj kelke da homoj*, *ducent kaj kelke da eŭroj*, aŭ eble *dudekkelke da homoj*, *centkelke da eŭroj*.

Iafoje oni vidas prefiksecan KELK kun la signifo “proksimume”: *kelkmil* = “proksimume mil”. Tia uzo estas tamen malrekomendinda, ĉar ĝi kolizias kun la ĉi-antaŭe montrita zamenhofa uzo de prefikseca KELK.

KELK estas uzata prefiksece ankaŭ ĉe tabelvortoj je I por emfazi la nedifinitecon: *kelkiuj* = “kelkaj, iuj”, *kelkiom* = “kelke, iom”. La iafoje uzata formo **kelkiu** (sen J) estas memkontraŭdira. *Iu* montras precize unu individuon, dum KELK montras pli ol unu.

### LAND

La radiko LAND estas uzata sufiksece en gentobazaj landonomoj (§35.4) anstataŭ UJ (§38.2.29): *Finnlando*, *Pollando*, *Skotlando*, *Svazilando*, *Svislando*, *Tajlando*. Estas konsilinde tiamaniere uzi LAND nur kiam tio donas internacian nomformon aŭ kiam tia nomformo estas tradicia en Esperanto.

### ON-vortoj

Kunmetaĵoj kun la sufikso ON (§38.2.27) estas ofte uzataj prefiksece: *duonhoro* = “duona horo, duono de horo”, *kvaronlitro* = “kvarona litro, kvarono de litro”, *milonmilimetro* = “milona milimetro, milono de milimetro”, *trionparto* = “triona parto”.

Eble tiaj kunmetaĵoj povas esti klarigataj kiel frazetvortigoj per O-finaĵo (§37.4): [*duono de horo*]-(periodo)-O → *duonhoro*.

Eblas krei ordinarajn kombinojn anstataŭe, ekz.: *horkvarono* (= “kvarono de horo”): *Pasis certe* ***horkvarono****, antaŭ ol la floreto povis denove rekonsciiĝi.* [FA1.148] Formoj kiel *horkvarono* estas tamen ekstreme maloftaj.

Prefikseca DUON havas iafoje la specialan signifon: “proksimume duone, nekomplete, preskaŭ”: *duonnuda* = “preskaŭ nuda”, *duonkuirita* = “ne komplete kuirita”.

Ĉe parencovortoj DUON havas du specialajn signifojn. Ĝi tie montras parencecon tra nur unu el la gepatroj kaj ankaŭ parencecon kreitan per reedziĝo:

- *duonfrato* = 1. frato kun kiu oni havas nur unu el la gepatroj komuna, 2. filo de duonpatr(in)o
- *duonfilo* = filo de la edz(in)o
- *duonpatro* = nova edzo de la patrino
- *duonpatrino* = nova edzino de la patro

Por parenceco kreita per regeedziĝo oni ankaŭ povas uzi la radikon VIC prefiksece: *vicpatro*, *vicfilo*, *vicfrato*. Oni proponis ankaŭ la neoficialan prefikson STIF° por tiu rolo: *stifpatro*, *stiffilo*, *stiffrato*, sed estas pli bone uzi VIC. Ĉe tiaj DUON-vortoj, kiuj povas havi ambaŭ signifojn de parenca DUON, oni prefere uzu VIC (aŭ eble STIF°) por regeedziĝa parenceco, kaj DUON nur por efektive duona parenceco.

### POV, KAPABL, VOL

La radikoj POV, KAPABL kaj VOL estas ofte uzeblaj sufiksece kiel pli precizaj alternativoj al la sufikso EM (§38.2.11): *sciema* → *scipova*, *scivola*;

*agema* → *agipova*, *agopova*, *agokapabla*, *agivola*, *agovola*; *kreema* → *krepova*, *krekapabla*, *krevola*; *vivema* → *vivipova*, *vivopova*, *vivokapabla*, *vivivola*, *vivovola*. (Apud *sciema* kaj *scivola* oni uzas ankaŭ tre ofte *scivolema*. Praktike ĉiuj tri vortoj estas samsignifaj.) Vidu ankaŭ la neoficialan sufikson IV (§39.1.21). Legu pli pri ligfinaĵoj en vortoj kiel *vivipova* kaj *agivola* en §37.3.

### RET

La radiko RET estas ofte uzata prefiksece kun la signifo "interreta, rilata al la Interreto": *poŝto* → *retpoŝto* = "interreta poŝto", *mesaĝo* → *retmesaĝo* = "retpoŝta mesaĝo", *retgazeto*, *retbutiko*, *retkamerao*, *retkomerco*. Komparu kun prefikseca BIT.

### ŜAJN, SIMIL, MANIER, STIL

La radikoj ŜAJN, SIMIL, MANIER kaj STIL estas ofte uzeblaj sufiksece anstataŭ la sufikso EC (§38.2.8) por krei pli precizajn vortojn: *vereca* → *verŝajna*, *versimila*; *trompeca* → *trompŝajna*, *trompmaniera*; *dieca* → *disimila*; *homeca* → *homsimila*; *virece* → *virmaniere*, *virstile*; *japanece* → *japanmaniere*, *japanstile*. Vidu ankaŭ la neoficialan sufikson ESK (§39.1.11).

### ŜTEL

La radiko ŜTEL estas uzata prefiksece kun la speciala signifo "sekretece", "kaŝite", "kun la intenco ne esti rimarkebla", ofte tute sen rilato al efektiva ŝtelado: *ŝteliri* = "iri silente kaj nerimarkeble (kvazaŭ por ŝteli)", *ŝtelobservi* = "observi kaŝite (por ke neniu tion rimarku)". La sama speciala signifo aperas ankaŭ en la E-vorto *ŝtel(ec)e*: *ŝtele eniri en domon* = "kaŝite kaj nerimarkeble eniri en domon (eble tute ne por ŝteli)", kaj ankaŭ en moviĝoverboj kiel *alŝteliĝi*, *enŝteliĝi* kaj *forŝteliĝi*.

### VIC

VIC estas uzata prefiksece por montri aferon aŭ personon, kiu anstataŭas aŭ povas anstataŭi ion aŭ iun: *vicprezidanto* = "anstataŭa prezidanto", *vicdirektoro* = "anstataŭa direktoro", *vicrado* = "rezerva rado". VIC estas ankaŭ uzebla en iaj parencovortoj, vidu ĉi-antaŭe ĉe ON-vortoj. Legu ankaŭ pri *vice al* kaj *vic' al* en §12.3.6.1.

### VIR

VIR estas uzata prefiksece por montri viran sekson. Komparu kun la sufikso IN (§38.2.20). Oni tiel povas uzi VIR nur ĉe io, kio povas havi sekson, kaj nur ĉe vortoj, kiuj ne estas viraj jam per si mem.

VIR estas prefiksece uzata precipe ĉe bestaj vortoj: *virĉevalo*, *virkato*, *virbovo*, *virhundido*, *virbesto*.

Ankaŭ ĉe homaj vortoj oni povas uzi VIR prefiksece: *virhomo*, *virprezidanto*, *virsekretario*. Sed ĉe homaj vortoj oni normale preferas uzi VIR kiel A-vorton: *vira homo*, *vira prezidanto*, *vira sekretario*.

Tre ofte oni tamen forlasas VIR, kvankam temas pri virbesto aŭ virhomo: §4.3.

Rimarku, ke la memstara vorto *viro* ĉiam signifas "plenkreska virhomo", dum prefikseca VIR nur montras viran sekson (ne homecon, nek plenkreskecon). La vorto *vira* jen montras nur viran sekson, jen inkluzivas homecon kaj plenkreskecon, laŭ la kunteksto.

En la komenca tempo oni uzis VIR sufiksece por montri viran sekson, sed tio delonge malaperis: *ĉevalviro*, *bovoviro*.

Anstataŭ VIR aŭ *vira* iuj uzas la proponitan virseksan sufikson IĈ° (§39.1.13). Legu ankaŭ pri seksa signifo de radikoj kaj O-vortoj en §4.3.

### 38.4.2. Afiksecaj rolvortetoj

Rolvortetoj (§12.3) estas tre ofte prefiksece uzataj en kunmetitaj vortoj. Tiaj kunmetaĵoj estas aŭ kombinoj (§37.3) aŭ frazetvortoj (§37.4). Oni devas fari distingon inter tiuj du manieroj uzi rolvortetojn prefiksece. En frazetvorto la rolvorteto rilatas kiel rolmontrilo al tio, kio staras tuj poste. En kombino la rolvorteto rilatas al io alia, kio eble eĉ ne estas esprimita.

#### Frazetvortoj

Vortoj kun prefikseca rolvorteto plej ofte estas frazetvortoj. Tia kunmetaĵo devenas de frazeto. La rolvorteto estas uzata prefiksece al tiu vorto, al kiu ĝi rilatas en la plena frazeto:

- *sen fino* → *senfina* = tia, ke ĝi estas sen fino
- *pri amo* → *priama* = tia, ke ĝi temas pri amo
- *antaŭ (ĝusta) tempo* → *antaŭtempa* = tia, ke ĝi okazas antaŭ la ĝusta tempo
- *inter nacioj* → *internacia*
- *per Esperanto* → *peresperanta* aŭ *per-Esperanta*
- *sen pensoj* → *senpense*
- *de la nasko* → *denaske*
- *ĝis la fino* → *ĝisfine*
- *kontraŭ veneno* → *kontraŭveneno* = kuracilo kontraŭ veneno
- *ekster la lando* → *eksterlando* = la tuta mondo krom la propra lando
- *sen vento* → *senvento* = stato sen vento, plene senmova aero
- *tra nokto* → *tranokti* = pasigi nokton, gasti tra nokto
- *per laboro* → *perlabori* = akiri per laboro
- *en teron* → *enterigi* = meti en la teron
- *sen movoj* → *senmovigi* = fari tia, ke movoj ne eblas
- *sen kuraĝo* → *senkuraĝigi* = forpreni ies kuraĝon
- *en ŝipon* → *enŝipiĝi* = iri en ŝipon (por forveturi)
- *en amon* → *enamiĝi (al iu)* = ekesti amanta (iun). La amo direktiĝas al la amato. Tial oni prefere diru *mi enamiĝis **al** vi*, ne **mi enamiĝis en vi(n)**.

La prefikseca *en* ne rilatas al la amato. Oni povas ankaŭ uzi *enamiĝi je iu*.

- *ekster la lando → eksterlandano* = ano de alia lando
- *por vivi → porvivaĵo* = rimedo por sin nutri
- *sen senco → sensencaĵo* = io, kio ne havas sencon

### Kombinoj

Prefikseca rolvorteto ankaŭ povas esti preciziga antaŭelemento en kombino. En tia vorto la rolvorteto tute ne estas rolmontrilo de la posta elemento, sed rilatas al io alia:

- *paroli → alparoli* = direkti sin al iu per parolado
- *veni → alveni* = veni al la celo
- *pagi → antaŭpagi* = pagi antaŭ la kutima aŭ deviga tempo
- *preni → depreni* = preni de iu aŭ de io (komparu kun prefikseca *for*, §38.4.3)
- *havi → enhavi* = havi en si
- *gluti → engluti* = enigi en sin per glutado
- *radikiĝi → enradikiĝi* = fiksiĝi en ion per siaj radikoj
- *ŝanĝi → interŝanĝi* = reciproke ŝanĝi inter si
- *rompi → interrompi* = rompi inter du punktoj
- *spaco → interspaco* = spaco inter du aferoj
- *paroli → kontraŭparoli* = paroli kontraŭ io
- *rimedo → kontraŭrimedo* = rimedo kontraŭ io
- *seĝo → kromseĝo* = aldona seĝo krom la ordinaraj
- *sidi → kunsidi* = sidi kune
- *sekvi → postsekvi* = sekvi post io
- *kompreni → subkompreni* = kompreni tion, kio estas kaŝita sub io
- *aĉeti → subaĉeti* = korupti per kaŝita mondonaco aŭ simile (figura signifo)
- *jupo → subjupo* = jupo portata sub alia jupo
- *ŝarĝi → superŝarĝi* = ŝarĝi super ia limo
- *signo → supersigno* = aldona signo super litero
- *aŭtoro → kunaŭtoro* = aŭtoro, kiu verkas kune kun alia aŭtoro

Kiam oni uzas tian vorton en frazo, la prefikseca rolvorteto ofte ripetiĝas antaŭ tio, al kio ĝi vere rilatas:

- *Li **eliris** <u>el la dormoĉambro</u> kaj **eniris** <u>en la manĝoĉambron</u>.* [FE.31]
- *Mi pro singardeco faros unu fojon **ĉirkaŭiron** <u>ĉirkaŭ la domo</u>.* [BV.67]
- *Mi <u>kontraŭ Vi</u> kiel bofilo, kiam la tempo venos, nenion **kontraŭparolos**.* [BV.35]
- *Tiuj vortoj **enhavas** <u>en si</u> profundan doloron.* [FA1.235]

- *Neniaj mokoj nek atakoj nin **debatos** de la vojo.* FK.267

Ofte oni ne ripetas la rolvorteton antaŭ tio, al kio ĝi rilatas, sed uzas anstataŭe alian rolvorteton:

- *Ĝi parolas nur pri tiaj instruoj, kiuj ne **kontraŭparolas** al la scienco.* OV.328 *Al* anstataŭ ripeto de *kontraŭ*.

Tio, al kio la prefikseca rolvorteto rilatas, ofte povas aperi kiel objekto de ĉi tia verbo:

- *La belan Saran li jam kelkfoje **ĉirkaŭiris**.* Rn.41 = *Ĉirkaŭ la bela Sara li jam kelkfoje iris.*
- *Ŝi **transiris** la sojlon.* M.134 = *Ŝi iris trans la sojlon.*

Sed tre ofte la objekto de ĉi tia verbo estas io tute alia sen rekta rilato al la prefikseca rolvorteto: ***Alportu** al mi metron da nigra drapo.* FE.32

Ne ekzistas ĝeneralaj reguloj, kiuj decidas, kio estu objekto de ĉi tia verbo (se ĝi entute estas objekta). Legu pli pri objektaj kaj senobjektaj verboj en §30.

### *El*

*El* povas esti tute normala prefikseca rolvorteto en kombinoj kaj frazetvortoj, ekz.: *eliri* = "iri el io", *elbati* = "bati (ion) el io", *elrigardi* = "rigardi el io" (arĥaike kaj idiotisme = "aspekti"), *el (la) lito → ellitiĝi* (frazetvorto) = "leviĝi el (la) lito".

Sed prefikseca *el* estas en kombinoj ankaŭ uzata kun la speciala signifo "komplete, ĝisfine, ĝisprete, ĝis rezulto, ĝis difekto, ĝis malapero":

- *trinki → eltrinki* = trinki ĉiom de io
- *lerni → ellerni* = lerni tute plene
- *fari → elfari* = produkti
- *kreski → elkreski* = kreski ĝis matureco
- *etendi → eletendi* = etendi laŭ la plena longo
- *uzi → eluzi* = uzi ĝis difektiĝo

Iuj tiaj *el*-vortoj ricevis specialan (figuran) signifon:

- *porti → elporti* = porti el io, porti (= toleri) ĝisfine
- *teni → elteni* = rezisti, ne cedi, pacience toleri, elporti
- *pensi → elpensi* = krei per pensado

Se estas risko pri konfuzo inter la propra signifo de *el*, kaj la speciala ĝisfina signifo, oni uzu ion alian prefiksece por esprimi la signifon "ĝisfine". Oni tiel uzas ekz. *tra*, *for*, SAT, kaj FIN. Oni devas tamen ĉiam atenti, ke la uzata radiko aŭ vorteto taŭgu laŭsence, ekz.: *trabori*, *trakuri*, *forkaŝi*, *satmanĝi*, *finkanti*, *finfari*, *finmanĝi* k.t.p.

Iuj kontraŭas al prefikseca FIN por ĝisfineco, sed malgraŭ diversaj teoriaj argumentoj, FIN fariĝis sufiĉe populara en tiu rolo. Ĉiuokaze prefikseca FIN estas ĉiam komprenata.

Oni ankaŭ povas tian ĉi signifon montri per plurvortaĵo, kio estas ofte la plej bona solvo: *legi ĝisfine*, *kuri tra la tuta urbo*, *manĝi ĝis sateco*, *kanti ĝis la fino*, *kanti la tutan kanton* k.t.p.

Oni multe klopodis por trovi ion, kio povus esti ĝenerale uzata prefiksece por la signifo "ĝisfine". Tio tamen ne sukcesis. Oni uzu kiom eble *el*, kiu estas zamenhofa kaj vaste uzata. En okazo de nepra bezono oni uzu alian rimedon.

### *Pri*

En frazetvortoj (kun A-finaĵo aŭ E-finaĵo) prefikseca *pri* estas uzata en ordinara maniero, ekz.: *pri amo → priama* = "tia, ke ĝi temas pri amo", *pri nutro → prinutra* = "tia, ke ĝi temas pri nutr(ad)o".

En kombinoj prefikseca *pri* kreas objektajn verbojn. Aŭ ĝi faras senobjektan verbon objekta, aŭ ĝi faras el jam objekta verbo novan objektan verbon. Normale tia *pri*-verbo havas originan *pri*-komplementon kiel objekton:

- *Li **silentis** pri la afero. → Li **prisilentis** la aferon. Silenti* estas senobjekta verbo. *Prisilenti* estas objekta verbo, kies objekto estas tio, pri kio oni silentas.
- *Li **pensis** (ion) pri ŝi. → Li **pripensis** ŝin. Pensi* estas objekta verbo, kies objekto estas la pensoj mem (sed kiu ofte aperas tute sen objekto). *Pripensi* estas objekta verbo, kies objekto estas la temo de la pensoj.

En iaj okazoj ĉi tia *pri*-verbo havas objekton, kiu origine ne estis *pri*-komplemento, sed ekz. *de*-komplemento aŭ *al*-komplemento. En tiaj verboj *pri* perdis sian propran signifon, kaj estas uzata nur por ŝanĝi la frazrolojn. *Pri* estas tiel uzata precipe en iuj tradiciaj verboj:

- *rabi → prirabi*

  *Ili **rabis** monon de la homoj.*

  *Ili **prirabis** la homojn (je/por mono).*
- *semi → prisemi*

  *Mi **semis** tritikon sur la kampon.*

  *Mi **prisemis** la kampon (per tritiko).*
- *ĵeti → priĵeti*

  *Ŝi **ĵetis** ŝtonojn al li.*

  *Ili **priĵetis** lin per ŝtonoj.*
- *konstrui → prikonstrui*

  *Ni **konstruos** domojn sur la monto.*

  *Ni **prikonstruos** la monton (per domoj).*
- *serĉi → priserĉi*

  *Ili **serĉis** armilojn ĉe li.*

  *Ili **priserĉis** lin (por armiloj).*
- *lumi → prilumi* = "ĵeti sian lumon ien"

  *La luno **lumis** en la ĉambron.*

*La luno* ***prilumis*** *la ĉambron.*

Nur io, kio mem estas luma, povas prilumi.
*Lumigi* = "fari tiel ke io lumu, provizi per lumo".

- *pluvi → pripluvi*

  ***Pluvas sur*** *la kampon.*

  *La nuboj* ***pripluvis*** *la kampon.*

  *Unu kampo estis* ***pripluvata****, kaj alia, ne* ***pripluvita****, elsekiĝis.* Am.4

  Dum *pluvi* estas sensubjekta verbo (§30.1), la verbo *pripluvi* bezonas subjekton.

Legu pri tiaj *pri*-verboj ankaŭ en la klarigoj pri verboj kaj frazroloj en §30.10.

Prefikseca *pri* en kelkaj okazoj nur servas por doni al verbo novan signifon, kiu iel rilatas al la origina signifo:

- *respondi → prirespondi* = devi prizorgi ion kaj porti la rezultojn de eventuala misaĵo (nun oni uzas pli ofte *respondeci* aŭ *responsi*)
- *juĝi → prijuĝi* = esprimi aproban aŭ malaproban opinion pri io
- *ĵuri → priĵuri* = doni aŭ dediĉi ofere al Dio

En tia uzo *pri* similas al la sufikso UM (§38.2.31).

### 38.4.3. Aliaj afiksecaj vortetoj

Krom rolvortetoj (§38.4.2) ankaŭ multaj aliaj vortetoj estas uzataj prefiksece en diversaj manieroj. Ĉi tie aperos nur kelkaj gravaj ekzemploj de tia uzo.

#### *Ĉi*

La loka vorteto *ĉi* (§14.1.2) estas tre ofte uzata prefiksece en frazetvortoj kun A-finaĵo aŭ E-finaĵo. Normale oni uzas por klareco dividostrekon post *ĉi*:

- *en tiu ĉi jaro → ĉi-jare*
- *sur ĉi tiu flanko → ĉi-flanke*
- *post tio ĉi → ĉi-poste*
- *sub ĉi tio → ĉi-sube*

Rimarku, ke *ĉi* estas memstara vorto en *tiu ĉi*, *ĉi tiu*, *tie ĉi*, *ĉi tie* k.t.p. Ne uzu dividostrekon tie.

Legu pli detale pri kunmetaĵoj kun *ĉi* en §14.1.2.

#### *Fi*

La ekkria vorteto *fi* (§18.1) estas ofte uzata prefiksece kun la signifo "malŝatinda, abomena". Prefikseca *fi* montras subjektivan indignon aŭ moralan kondamnon kontraŭ tio, kio staras poste:

- *homo → fihomo* = naŭza, malmorala, malŝatinda homo
- *ŝerco → fiŝerco* = senhonta ŝerco
- *domo → fidomo* = domo, kie okazas abomenaj malŝatindaj aferoj

- *gazeto* → *figazeto* = abomena gazeto
- *insekto* → *fiinsekto* = malŝatinda aŭ parazita insekto
- *herbo* → *fiherbo* = trudherbo, herbo kiu malhelpas la kulturadon de aliaj utilaj plantoj (oni uzas ankaŭ *herbaĉo*, sed la herbo mem ne estas malbonkvalita, nur nedezirata)
- *karesi* → *fikaresi* = senhonte, malĉaste kaj trude karesi
- *fama* → *fifama* = fama pro malŝatindaj aferoj

Prefikseca *fi* kaj la sufikso AĈ (§38.2.1) estas similaj. *Fi* estas pli subjektiva. Ĝi esprimas indignon kaj malŝaton. AĈ estas pli objektiva. Ĝi montras maltaŭgecon kaj malbonan kvaliton. En la frua tempo, antaŭ ol AĈ aperis en la lingvo, prefikseca *fi* estis uzata en ambaŭ signifoj.

### *For*

La loka kaj mova vorteto *for* (§14.1.3) estas ofte uzata prefiksece ĉe agaj vortoj: *foriri*, *foriro*, *forkuri*, *forkurado*, *forfali*, *forĵeti*, *forŝiri*, *forpermesi*, *fortimigi*, *forargumenti*, *forbuĉi*, *fordormi*, *foresti*, *foresto*. Ĉiuj tiaj vortoj estas tute normalaj kombinoj. Ofte oni ankaŭ povas uzi *de* en ĉi tiaj vortoj: *forŝiri* ≈ *deŝiri*, *forpreni* ≈ *depreni*, *fortranĉi* ≈ *detranĉi*. Sed *for* donas pli fortan signifon.

### *Kvazaŭ*

Prefikseca *kvazaŭ* (§14.3.12) montras, ke io ne havas sian veran signifon, sed signifon apudan, similan, proksimuman: *kvazaŭedzo* = "viro, kiu loĝas kun virino kvazaŭ edzo" (= konkubo), *kvazaŭhomo* = "homsimila pupo", *kvazaŭrimo* = "rimo per similaj sonoj". Komparu kun la neoficialaj sufiksoj OID (§39.1.26) kaj ESK (§39.1.11).

### *Mem*

Prefikseca *mem* (§14.3.13) havas du malsamajn signifojn: 1. "sen helpo de alia": *memvole*, *memlerninto*, *memdisciplino*, *memstara*, *memkompreneble*. 2. "al si mem, pri si mem, sin mem": *memestimo*, *memamo*, *memdefendo*, *memmortigo*, *memportreto*, *memofero*. Se la signifo estas "sin mem", oni povas ankaŭ uzi *sin* prefiksece.

### *Ne*

Prefikseca *ne* (§21) montras foreston, mankon de io (ekz. de eco): *neĝentila*[FE.16], *nelonge*[FE.25], *nefermita*[FE.33], *nematura*[FE.36], *nelerta*[FE.37], *nekomprenebla*[FE.41], *nelegeble*[FE.41], *nekredebla*[FE.41], *nejudo* = "homo, kiu ne estas judo", *ne-Kopenhagano*[FA1.128] = "persono, kiu ne loĝas en Kopenhago", *nelibroj* = "kategorio de varoj (en librovendejo k.s.), kiuj ne estas libroj (sed ekzemple diskoj)". Komparu kun prefikseca *sen* (§38.4.2). Legu ankaŭ pri la diferenco inter prefikseca *ne* kaj la prefikso MAL en §38.3.7.

### *Sin*

La pronomo *si* (§11.6) kun N-finaĵo estas ofte uzata prefiksece anstataŭ *mem* en la signifo "sin mem": *sinfido*, *sindefendo*, *singarda*, *sindona*.

*Sin* kiel memstara vorto estas uzebla nur pri la tria persono, sed prefikseca *sin* estas uzata ankaŭ pri la unua kaj dua personoj: *Kontraŭ s-ro K. mi estos **singarda**.* [OV.550] = *Mi gardos **min** kontraŭ s-ro K.*

*Sin*-vortoj estas frazetvortoj, kiuj deiras de I-verba frazeto:

- *sin defendi* → [*sin defendi*]-(ago)-O → *sindefendo* = "la ago defendi sin mem"

Tia *sin*-vorto povas havi ĉian finaĵon krom verba finaĵo: *sinfido*, *sinfida*, *sinfide*. Se oni volas uzi verban finaĵon, oni devas reiri al la origina frazeto, kie *sin* estas aparta vorto. Se *sin* ne rilatas al la tria persono, oni devas tiam ŝanĝi al *min*, *nin* aŭ *vin* laŭ la senco:

- *ŝia sindefendo* → *Ŝi defendas **sin**.*
- *ilia sindefendo* → *Ili defendas **sin**.*
- *mia sindefendo* → *Mi defendas **min**.*
- *nia sindefendo* → *Ni defendas **nin**.*
- *via sindefendo* → *Vi defendas **vin**.*

En tiaj ĉi vortoj oni konservas la N-finaĵon de *sin*. Normale tamen N-finaĵoj (same kiel J-finaĵoj) forfalas ene de kunmetitaj vortoj (§37.4).

# 39. Neoficialaj afiksoj

Krom la oficialaj afiksoj (§38) ekzistas ankaŭ neoficialaj. La plej multaj el ili estas specialaj afiksoj uzataj nur en faka lingvaĵo, en scienco, en teĥniko k.s. Iuj estas nuraj proponoj, kaj estas apenaŭ uzataj entute. Sed kelkaj aperas eĉ en ordinara lingvaĵo.

Ofte estas malfacile juĝi, ĉu temas pri vera afikso, aŭ pri restaĵo de afikso en alia lingvo, ekz. Latino aŭ la greka. Tia ŝajna afikso nomiĝas eksafikso. La ĉi-postaj klarigoj tamen provas laŭeble distingi. Tio, kio ĉiam nur estas eksafikso, ne estas klarigita ĉi tie. Ne aperas do ekz. radikofinoj kiel "aci", "ici", "itat" kaj "ent", aŭ radikokomencoj kiel "dia", "epi" kaj "peri", ĉar ili neniam estas uzataj kiel veraj afiksoj en Esperanto. Se oni interesiĝas pri tiaj radikopartoj, oni legu libron pri Latino aŭ la greka. Sed ja aperas kelkaj "duonafiksoj", kiuj normale nur estas eksafiksoj, sed kiuj iafoje aperas prove, eksperimente aŭ fuŝite en vera afiksa uzo.

Legu ankaŭ pri ŝajnaj IN-afiksoj en §38.2.20, kaj ŝajnaj ISM-sufiksoj kaj IST-sufiksoj en §38.2.24.

## Ĉu enkonduki novajn afiksojn?

Multaj esperantistoj pensas, ke afiksoj estas la plej bona parto de Esperanto. Tial ili volas krei pli da afiksoj. "Ju pli multaj afiksoj, des pli bona Esperanto." La boneco de la Esperanta vortfarado tamen ne troviĝas en la afiksa sistemo, sed ĝenerale en la eblo libere krei kunmetitajn vortojn. Tion oni faras ne nur per afiksoj, sed ankaŭ per kunmetado de ordinaraj radikoj kaj vortetoj.

Ordinarajn radikojn oni uzas en la vortfarado laŭ ĝeneralaj principoj, kiuj estas tiel facilaj, ke plej multaj lernolibroj eĉ ne klarigas ilin. Oni lernas tian vortfaradon precipe el praktikaj ekzemploj.

La afiksojn oni devas tamen aparte lerni. Por ĉiu (vera) afikso oni devas ekscii, kiel uzi ĝin. Tial la lernolibroj ilin zorge klarigas.

La oficialaj afiksoj funkcias bonege kaj estas tre utilaj en Esperanto, ĉar ĉiuj jam kiel komencantoj lernas ilin. Novaj afiksoj tamen ne estas troveblaj en la lernolibroj, kaj oni apenaŭ havas okazon ekscii, kiel uzi ilin.

Novaj ordinaraj radikoj facile eniras en la lingvon, ĉar por ili ne validas specialaj reguloj, sed novaj afiksoj malofte sukcesas hejmiĝi en Esperanto. Se oni sentas, ke nova radiko estas bezonata, oni do prefere enkonduku ĝin ne kiel afikson, sed kiel ordinaran radikon, kiun ĉiuj povas facile uzi laŭ la bazaj vortfaraj principoj.

Iuj novaj afiksoj renkontas problemojn, ĉar ili kolizias kun jam ekzistantaj vortoj. Tiaj novaĵoj estas normale tre evitindaj.

La ĉi-antaŭaj avertoj tamen ne signifas, ke oni malpermesu ĉiajn ajn novajn afiksojn. Se nova afikso vere estas bezonata, kaj funkcias bone, tiam ĝi ja povas esti akceptata. Multaj neoficialaj fakaj afiksoj funkcias tute bone, kaj oni uzu ilin libere sur iliaj apartaj uzokampoj.

## 39.1. Neoficialaj sufiksoj

### 39.1.1. AB°

"Fiksita instalaĵo". Nur eksperimente uzata por diversaj instalaĵoj: *trinki* → **trinkabo** = "trinkakvoĵetilo, trinkŝprucilo", *ellasi* → **ellasabo** = "neceseja seĝo". (AB devenas de la nekunmetita vorto *lavabo* = "lavpelvo fiksita al muro".) AB estas evitenda. Por esti komprenata oni uzu esprimojn kiel *trinkilo*, *trinkfontano*, *necesejo*, *neceseja seĝo*, *necesseĝo* k.t.p. (Kaj anstataŭ *lavabo* sufiĉas ofte *lavujo*.)

### 39.1.2. AC

Ekssufikso en multaj nomoj de plantfamilioj: *kompozitacoj*, *labiacoj*, *kruciferacoj*.

#### Vera sufikso

"Plantfamilio". Uzata en botaniko post la tipa membro de la familio: *rozo* → *rozacoj* = "la familio de rozosimilaj floroj", *ulmo* → *ulmacoj* = "la familio de ulmosimilaj arboj". Oni uzu AC nur laŭ la internaciaj botanikaj nomreguloj. AC respondas al la latina sufikso "*-aceae*". Prefere oni rigardu tiajn vortojn kiel nekunmetitajn. Komparu kun AL (§39.1.3), E (§39.1.7), ED (§39.1.8), EN (§39.1.9) kaj OID (§39.1.26).

### 39.1.3. AL

Ekssufikso en multegaj radikoj kun plej diversaj signifoj: *normala*, *formala*, *originala*, *kriminala*, *speciala*, *sociala*, *materialo*, *vokalo*, *signalo*, *generalo*, *centralo*.

#### Vera sufikso

1. "Plantordo". Uzata en botaniko post la plej tipa membro de la ordo: *rozo* → *rozaloj* = "la ordo de rozosimilaj plantoj", *poligono* → *poligonaloj*, *orkido* → *orkidaloj*. Oni uzu AL nur laŭ la internaciaj botanikaj nomreguloj. AL respondas al la latina sufikso "*-ales*". Prefere oni rigardu tiajn vortojn kiel nekunmetitajn. Komparu kun AC (§39.1.2), E (§39.1.7), ED (§39.1.8), EN (§39.1.9) kaj OID (§39.1.26).

2. "Osto". Evitinda anatomia sufikso: *nazo* → **nazalo**, *femuro* → **femuralo**. Uzu OST anstataŭe: *nazosto*, *femurosto* k.t.p.

3. "Rilata, apartena". Oni proponis uzi AL por krei el ecaj radikoj A-vortojn kun rilata signifo: *varmo* → **varmala** = "rilata al varmo, temanta pri varmo" (*varma* = "kun multe da varmo"); *sano* → **sanala** = "rilata al sano, apartena al sano" (*sana* = "havanta sanon"). Tiu propono neniam realiĝis en la lingvo. Oni esprimu tiajn signifojn per plurvortaĵoj: *pri varmo*, *de varmo*. Eventuale oni povas uzi kunmetaĵojn kun *pri*, *rilata* aŭ simile: *privarma*, *varmorilata*, *varmotema*, *prisana*, *sanrilata*.

### 39.1.4. ANC

Ekssufikso en multaj vortoj kun diversaj signifoj: *substanco*, *konkordanco*, *ekstravaganco*, *ambulanco*, *disonanco*, *kvitanco*. Iuj tiaj vortoj montras fizikajn grandojn en elektroscienco: *impedanco*, *reluktanco*, *admitanco*, *per-meanco*.

#### Vera sufikso

"Fizika grando". Oni provis en scienco uzi ANC kiel veran sufikson por fari vortojn por fizikaj grandoj: *indukto → induktanco*, *vario → varianco*. Tiajn vortojn oni prefere rigardu kiel nekunmetitajn.

### 39.1.5. ARI°

Proponita matematika sufikso por nombrosistemoj: *du → *duaria** = "duuma", *dek → *dekaria** = "dekuma". ARI ne estas praktike uzata. Oni uzu UM (§38.2.31) en tiaj vortoj.

### 39.1.6. ATOR (kaj ADOR°)

Ekssufikso en multaj radikoj por aparatoj aŭ agantoj: *inkubatoro*, *radiatoro*, *generatoro*, *karburatoro*, *diktatoro*, *uzurpatoro*.

#### Vera sufikso

"Aparato". Iafoje uzata anstataŭ IL (§38.2.19), kiam temas pri komplikita aparato aŭtomate funkcianta: *pumpi → *pumpatoro** = "aŭtomata pumpilo", *kalkuli → *kalkulatoro**, *raboti → *rabotatoro**. Oni eĉ proponis la vari-anton *ADOR*° por ne-aŭtomataj konstrumaŝinoj: **asfaltadoro**, **el-kavigadoro**. ADOR kolizias kun la verbo *adori* (= "honori kiel diaĵon"). Oni esprimu tiajn ideojn per la vortoj *aparato*, *maŝino* kaj *aŭtomato*, aŭ simple per la sufikso IL, kiu montras kaj simplajn ilojn, kaj ellaboritajn maŝ-inojn: *pumpmaŝino*, *aŭtomata pumpilo*, *kalkulaparato*, *kalkulaŭtomato*, *rabotmaŝino*, *asfalt(ad)maŝino*, *elkavigmaŝino* (aŭ simple *fosmaŝino*).

### 39.1.7. E°

1. "Plantotribo" (subdivido de plantofamilio). Uzata en botaniko post la tipa membro de la tribo: *asklepiado → asklepiadeoj* = "la tribo de asklepiadosimilaj plantoj". EN respondas al la latina sufikso "*-eae*". Oni uzu E nur laŭ la internaciaj botanikaj nomreguloj. Preferinde oni rigardu tiajn vortojn kiel nekunmetitajn. Komparu kun AC (§39.1.2), AL (§39.1.3), ED (§39.1.8), EN (§39.1.9) kaj OID (§39.1.26).

2. "Koloro". Proponita, sed apenaŭ uzata sufikso por fari kolorvortojn el radikoj, kiuj ne mem montras koloron: *rozo → *rozea** = "rozkolora, roze ruĝa", *neĝo → *neĝea** = "neĝkolora, neĝe blanka", *polvo → *polvea** = "polvokolora, polvogriza". Oni uzu kunmetaĵojn kun la radiko KOLOR (*rozkolora*, *neĝkolora*) aŭ precizajn kombinojn kun kolororadikoj (*rozoruĝa*, *neĝblanka*), aŭ plurvortaĵojn (*roze ruĝa*, *blanka kiel neĝo*). Ofte la sufikso EC (§38.2.8) povas esti sufiĉa: *rozeca*, *neĝeca*, *polveca*. Sed tiaj EC-vortoj ne nepre montras koloran similecon.

La sufikso E aperas en *PIV* nur por "plantotribo". La sencon "koloro" proponis *Werner* (§46) en 1986.

### 39.1.8. ED

"Bestofamilio". Uzata en zoologio post la tipa membro de la familio: *cervo* → *cervedoj* = "la familio de cervosimilaj bestoj", *mustelo* → *musteledoj*. Oni uzu ED nur laŭ la internaciaj zoologiaj nomreguloj. ED respondas al la latina sufikso "*-idae*". Prefere oni rigardu tiajn vortojn kiel nekunmetitajn. Komparu kun AC (§39.1.2), AL (§39.1.3), E (§39.1.7), EN (§39.1.9) kaj OID (§39.1.26).

### 39.1.9. EN

"Besta subfamilio". Uzata en zoologio post la tipa membro de la subfamilio: *lutro* → *lutrenoj* = "la subfamilio de lutrosimilaj bestoj", *mustelo* → *mustelenoj*. Oni uzu EN nur laŭ la internaciaj zoologiaj nomreguloj. EN respondas al la latina sufikso "*-inae*". Prefere oni rigardu tiajn vortojn kiel nekunmetitajn. Komparu kun AC (§39.1.2), AL (§39.1.3), E (§39.1.7), ED (§39.1.8) kaj OID (§39.1.26).

### 39.1.10. ENZ°

"Substanco, kiu servas por ago". Eksperimente uzata, precipe en ĥemio, anstataŭ IL (§38.2.19), kiam ne temas pri instrumento, sed pri substanco: *solvi* → *solvenzo* = "solvantaĵo", *stabiligi* → *stabiligenzo* = "stabiliga substanco", *dolĉigi* → *dolĉigenzo* = "dolĉigaĵo". En faka lingvaĵo ENZ eble povas esti utila, sed normale oni uzu IL, (ANT)AĴ, aŭ diversajn kunmetaĵojn kaj plurvortaĵojn.

### 39.1.11. ESK

Ekssufikso en kelkaj radikoj kun la signifo "simila": *groteska*, *fluoreski*, *lumineski*.

#### Vera sufikso

"Simila sed ne vera, maniera, stila". Iafoje uzata anstataŭ EC (§38.2.8): *japana* → *japaneska* = "simila al japana stilo, ŝajne japana", *vira* → *vireska* = "virosimila", *blua* → *blueska* = "blueta, neklare blua, blusimila". ESK estas malofte uzata. Normale sufiĉas EC: *japaneca*, *vireca*, *blueca*. Oni ankaŭ povas uzi kunmetaĵojn kun ŜAJN aŭ SIMIL (§38.4.1): *ŝajnblua*, *Japansimila* k.s.

### 39.1.12. I

Ekssufikso en multegaj radikoj kun plej diversaj signifoj. La vokalo "i" estas senkonkurence la plej ofta radikofino en Esperanto.

Interalie multaj nomoj de sciencoj kaj okupoj finiĝas per "...io": *geografio*, *biologio*, *agronomio*, *homeopatio*, *anatomio*, *ĥirurgio*, *filozofio*. Por tiaj vortoj tre ofte ekzistas paralela radiko sen "i" por la responda fakulo: *geografo*, *biologo*, *agronomo*, *homeopato*, *anatomo*, *ĥirurgo*, *filozofo*. Atentu, ke la radiko sen "i" iafoje havas alian signifon. Ekz. *telegrafio* estas okupo,

sed *telegrafo* estas aparato, ne persono. El vortoj por sciencoj kaj okupoj oni ankaŭ povas fari nomojn de fakulo per la sufikso IST: *geografiisto*, *biologiisto*, *agronomiisto* k.t.p. Pro la longeco de tiaj vortoj, kaj pro la malagrabla duobla "i", oni normale preferas sensufiksan vorton, kiam tia ekzistas.

I estas ankaŭ ekssufikso en multaj landonomoj: *Aŭstralio*, *Ĝibutio*, *Haitio*, *Sirio*.

## Vera sufikso

1. "Lando" (post nomo de popolo). Tre ofte uzata paralele kun la sufikso UJ en landonomoj (§35.4):

- *francoj* → *Francio* = Francujo
- *japanoj* → *Japanio* = Japanujo

La landnoma sufikso I ne estas oficiala. Iam ĝi estis malrekomendata de la Akademio de Esperanto, sed ne plu (*Aktoj de la Akademio II*, p. 14). Ĝi eĉ estas uzata (paralele kun UJ) en la Akademia *Listo de Rekomendataj Landnomoj*.

2. "Lando" (post nomo de urbo, rivero, monto k.s.). Uzata en kelkaj okazoj por eviti plursencajn geografiajn nomojn:

- *Meksiko* (lando, federacia ŝtato, urbo) → *Meksikio* [LR.18B] (nur lando)
- *Kebeko* (provinco, urbo) → *Kebekio* (nur provinco)
- *Senegalo* (lando, rivero) → *Senegalio* (nur lando)
- *Luksemburgo* (lando kaj urbo) → *Luksemburgio* (nur lando)
- *Brandenburgo* (germana federacia lando kaj urbo) → *Brandenburgio* (nur federacia lando)
- *Romo* (urbo) → *Romio* (la roma regno, la roma imperio)

En multaj similaj okazoj oni tamen neniam uzas tiun ĉi metodon, ekz.: *Malto* (lando kaj insulo), *Singapuro* (lando kaj urbo), *Nikaragvo* (lando kaj lago), *Kuvajto* (lando kaj urbo), *Paragvajo* (lando kaj rivero), *Kenjo* (lando kaj monto), *Sanmarino* (lando kaj urbo).

La Akademio de Esperanto prave rekomendis ne uzi la sufikson I en tiaj ĉi nomoj (*Aktoj de la Akademio III*, p. 49). Nur se jam internacie ekzistas tiaj paralelaj nomoj (kun "i" por lando – sen "i" por urbo, rivero aŭ simile), oni ja uzu la distingon. Tiam ne temas pri Esperanta sufikso, sed pri parto de radiko. Oni do ja uzu ekz. *Alĝero* (urbo), *Alĝerio* (lando); *Tunizo* (urbo), *Tunizio* (lando); *Namibo* (dezerto), *Namibio* (lando), ĉar tiaj nomoj ekzistas ankaŭ en aliaj lingvoj. Sed oni prefere ne uzu formojn kiel *Meksikio*, *Kebekio*, *Senegalio* k.a., ĉar tiuj nomoj ekzistas nur en Esperanto. En unu okazo temas pri du malsamaj landoj: *Niĝero* (rivero kaj lando inter Malio kaj Ĉado), *Niĝerio* (lando inter Benino kaj Kameruno). En unu okazo la internacia distingo estas inversa: *Brazilo* (lando), *Brazilio* aŭ *Braziljo* (urbo). Se oni uzas tiajn ĉi "i" nur laŭ la internaciaj formoj, tiaj okazoj tute ne kreas problemojn.

Se internacie du aŭ pli da nomoj samas, oni uzu laŭ bezono esprimojn kun *urbo*, *rivero*, *monto* k.s. Tio estas multe pli klara: *Meksikurbo*, *la urbo Meksiko*, *la federacia ŝtato Meksiko*, *la lando Meksiko*, *Kebekurbo*, *la provinco Kebeko*, *la rivero Senegalo*, *la lando Senegalo*, *la lando Luksemburgo*, *Luksemburgurbo*, *la urbo Luksemburgo*, *la (federacia) lando Brandenburgo*, *la urbo Brandenburgo*, *la Roma regno* [Rt.130] k.t.p.

### 39.1.13. IĈ°

IĈ° = "la vira sekso". Proponita sufikso por indiki, ke homo aŭ besto estas vira: *najbaro → najbariĉo* = "vira najbaro", *kuracisto → kuracistiĉo* = "vira kuracisto", *bovo → boviĉo* = "virbovo", *kato → katiĉo* = "virkato".

La sufikson IĈ° elpensis sendepende pluraj homoj inspirite de la karesnoma sufikso ĈJ (§38.2.6) (komparu kun la paro IN §38.2.20 kaj NJ, §38.2.25). Kredeble la unua propono aperis jam en la jaro 1976. IĈ° estas nun (en la jaro 2019) senkonkurence la plej populara propono de tia sufikso, kaj nemalmultaj homoj jam uzas ĝin. Sed la plej multaj ankoraŭ uzas *vira* aŭ prefiksecan VIR (§38.4.1).

Iuj volas uzi IĈ° ankaŭ ĉe viraj radikoj, kies signifon ili do volas ŝanĝi al sekse neŭtrala: **patro** (kun neŭtrala interpreto) → **patriĉo** = "patro", **knabo** (kun neŭtrala interpreto) → **knabiĉo** = "knabo", **viro** (kun neŭtrala interpreto) → **viriĉo** = "viro". Tiel drastaj signifoŝanĝoj de oftaj kaj firme enradikiĝintaj vortoj estus vera reformo de la lingvo, kaj tial malfacile realigebla. Tia sekse neŭtrala uzo ekz. de *patro* eĉ povas kaŭzi gravajn miskomprenojn. Aliaj anstataŭe provas enkonduki tute novajn sekse neŭtralajn vortojn, ekz. *parento* (§4.3) por "patro/patrino".

Legu ankaŭ pri seksa signifo de radikoj kaj O-vortoj en §4.3, la proponita neduuma sufikso IP° (§39.1.18), la proponitaj karesnomaj sufiksoj J° kaj PJ° (§39.1.23) kaj la sekse neŭtrala unu-nombra pronomo *ri°* (§11.5).

#### Ordinara radiko

- *iĉo* = vira homo, vira besto
- *iĉa* = virseksa, tia kiel iĉo, rilata al iĉo k.s.

Fakte IĈ estas uzata pli ofte en la vortoj *iĉo* kaj *iĉa* ol ĝi estas uzata kiel sufikso. La vorto *iĉo* estas sendependa de aĝo, dum la vorto *viro* ordinare havas la sencon de plenkreska virseksa homo (§38.4.1). Se oni volas paroli pri virseksaj homoj sendepende de aĝo, mankas oportuna vorto en klasika Esperanto, kio kredeble kontribuis al la populariĝo de la vorto *iĉo*.

### 39.1.14. IF°

Ekssufikso en kelkaj vortoj kun IG-eca signifo: *modifi*, *amplifi*, *klasifi*.

#### Vera sufikso

"Igi io". Proponita sed apenaŭ uzata teĥnika sufikso por tiaj okazoj, kiam oni volas esprimi "igi io" kaj ne "igi ia": **varmifi** = "igi varmo, ŝanĝi ian energiformon en varmon" (*varmigi* = "igi varma, doni la econ varmo al io"), **acidifi** = "igi acido, ŝanĝi substancon tiel, ke ĝi fariĝas acido" (*acidigi*

= “igi acida, doni acidecon al io”). Oni esprimu tiajn specialajn signifojn per pluraj vortoj: *igi varmo*, *ŝanĝi en acidon* k.s. Rimarku, ke IG (§38.2.17) en multaj okazoj signifas “igi io”: *edzinigi*, *polvigi*.

### 39.1.15. IK

Ekssufikso aŭ ŝajnsufikso en multegaj radikoj kun plej diversaj signifoj: *formiko*, *fortika*, *harmoniko*, *heliko*, *klasika*, *kleriko*, *kliniko*, *koliko*, *komika*, *komuniki*, *maniko*, *miristiko*, *narkotiko*, *paniko*, *persiko*, *polemiko*, *prediki*, *rustika*, *saliko*, *trafiko* k.a. Multaj “ik”-vortoj estas nomoj de sciencoj, fakoj, artoj, okupoj k.s.: *botaniko*, *dinamiko*, *fiziko*, *fonetiko*, *grafiko*, *gramatiko*, *heraldiko*, *liriko*, *logiko*, *matematiko*, *meĥaniko*, *mnemoniko*, *muziko*, *optiko*, *plastiko*, *politiko*, *teĥniko* k.a.

#### Vera sufikso

“Fako, scienco, okupo”. Ofte oni povas rigardi IK kiel veran sufikson. Iafoje ĝi aperas post nomo de persono, kiu okupiĝas pri la fako: *ĝardenisto → ĝardenistiko*, *gimnasto → gimnastiko*, *ĵurnalisto → ĵurnalistiko*, *lingvisto → lingvistiko*, *stilisto → stilistiko*, *poeto → poetiko*, *retoro → retoriko*. Alifoje IK aperas post la temo de la fako: *elektrono → elektroniko*, *metodo → metodiko*, *metro → metriko*, *simbolo → simboliko*, *stokasta → stokastiko*. Ĝenerale estas preferinde rigardi tiajn vortojn kiel nekunmetitajn.

Iuj tamen volas, ke IK estu efektiva sufikso. Iuj iafoje eĉ insistas, ke ĝi devas esti efektiva Esperanta sufikso. Laŭ multaj IK ĉiam aperu post la temo de la fako, ne post la isto. Ili kreas vortojn kiel: *ĝardeno → ĝardeniko* = “ĝardenistiko”, *ĵurnalo → ĵurnaliko* = “ĵurnalistiko”, *lingvo → lingviko* = “lingvistiko”, *sono → soniko* = “fonetiko”, *sistemo → sistemiko* = “sistematiko”. Normale oni ĉi tiel uzas IK nur kiam ekzistas responda internacia vorto kun “ik”. Se la internacia vorto finiĝas per “ologi”, oni ofte preferas la samsignifan sufikson OLOGI (§39.1.29).

Iuj ĉi tiaj IK-vortoj povas funkcii praktike, sed sistema uzo de IK en ĉi tia maniero kondukus al grandega konfuzo, ĉar multaj jam ekzistantaj vortoj pro tio subite ŝajnus havi tute alian signifon ol ili vere havas, ekz.: *formiko*, *heliko*, *kleriko*, *kliniko*, *koliko*, *komiko*, *komuniko*, *maniko*, *miristiko*, *paniko*, *persiko*, *rustiko*, *saliko*, *trafiko*, *dialektiko*, *grafiko*, *liriko*, *logiko*, *muziko*, *plastiko* kaj multaj aliaj.

Se oni insistas, ke IK nur aperu post temo, tiam la ĥaoso ankoraŭ pligrandiĝas, ĉar tiam vortoj kiel *lingvistiko*, *ĵurnalistiko* kaj *ĝardenistiko* ŝajnas esti la sciencoj pri *lingvistoj*, *ĵurnalistoj* kaj *ĝardenistoj*. Iuj “IK-istoj” efektive kritikas tiajn vortojn kiel nelogikajn kaj fuŝitajn, kvankam ĝuste la ekuzo de IK kiel efektiva sufikso kreis tiun konfuzon. Tiuj vortoj estas nekunmetitaj, kaj povas ŝajni strangaj nur al tiuj, kiuj insistas, ke IK estu sufikso.

Oni lasu ĉi tiajn internaciajn vortojn en paco. Se oni volas krei pli facilajn alternativojn, oni faru tion en maniero, kiu ne kaŭzas konfuzon. Ofte oni povas uzi jam ekzistantajn vortojn kiel *scienco*, *fako*, *arto* k.s.: *lingvoscienco*, *ĝardenofako*, *ĝardena teĥniko*, *scienco pri lingvosonoj*, *sistema metodo*, *anglaj studoj* k.s.

### 39.1.16. ILION

Ekssufikso en kelkaj vortoj por grandegaj nombroj: *miliono*, *biliono*, *triliono*.

#### Vera sufikso

Sufikso por fari el nombraj vortetoj vortojn por grandegaj nombroj: *duiliono* = "biliono, miliono da milionoj", *triiliono* = "triliono, miliono da duilionoj", *kvariliono* = "kvadriliono, miliono da triilionoj".

La kialo por enkonduki ILION (kaj ILIARD, §39.1.17) estis internacia konfuzo pri la vortoj *biliono*, *triliono* k.t.p., kaj tial en Esperantaj vortaroj tiaj vortoj havis neklarajn signifojn. Sed *PIV* donas ekde la jaro 2002 definitivajn signifojn por la vortoj *biliono*, *triliono*, *kvadriliono* kaj *kvintiliono*. Vortoj faritaj el ILION (kaj ILIARD) povas tamen senprobleme esti uzataj paralele kun la internaciaj vortoj: *triiliono* = *triliono*, *kvariliono* = *kvadriliono* k.t.p. Preskaŭ nur matematikistoj uzas tiajn vortojn por nombroj pli altaj ol *biliono*. La ĉiutaga lingvo bezonas normale nur la vortojn *miliono* kaj *miliardo*, iafoje *biliono*, eventuale iam *triliono*.

Legu pli detale pri O-vortaj nombrovortoj en §23.2.

### 39.1.17. ILIARD

"Mil ...ilionoj". Sufikso por fari el nombraj vortetoj vortojn por grandegaj nombroj: *duiliardo* = "mil duilionoj, mil bilionoj", *triiliardo* = "mil triilionoj, mil trilionoj" k.t.p. Vidu pli detalajn klarigojn ĉe la sufikso ILION (§39.1.16) kaj ĉe O-vortaj nombrovortoj (§23.2).

### 39.1.18. IP°

"Neduuma persono". Proponita sufikso por montri, ke persono estas neduuma, t.e. nek viro, nek virino (aŭ eble sekse ambigua). IP° estas tre nove proponita (en la jaro 2019) kaj estas nur eksperimente uzata: *amiko* (de ĉiu ajna sekso) → *amikipo* = "amiko neduuma". Oni kompreneble povas uzi la simplan sekse neŭtralan vorton *amiko* ankaŭ por neduuma persono, sed per IP° eblas aparte atentigi pri neduumeco.

Legu ankaŭ pri seksa signifo de radikoj kaj O-vortoj en §4.3, la proponita virseksa sufikso IĈ° (§39.1.13), la sekse neŭtrala unu-nombra pronomo *ri*° (§11.5) kaj la proponitaj karesnomaj sufiksoj J° kaj PJ° (§39.1.23).

### 39.1.19. ISTAN°

Ekssufikso en kelkaj landonomoj (ofte la "i" mankas): *Pakistano*, *Hindustano*, *Dagestano*, *Turkestano*.

#### Vera sufikso

"Lando". Kelkfoje rigardebla kiel vera sufikso, se ekzistas responda popolnomo: *afgano* → *Afganistano*, *kirgizo* → *Kirgizistano*, *uzbeko* → *Uzbekistano*. Estas pli bone rigardi tiajn landonomojn kiel nekunmetitajn. Ĉiuokaze oni povas uzi ISTAN nur kiam ekzistas responda internacia formo kun "(i)stan". Plej bone estas tamen uzi UJ (§38.2.29) aŭ I (§39.1.12) en tiaj

nomoj (se ekzistas simpla popolnomo): *Afganujo*, *Afganio*, *Kirgizujo*, *Kirgizio*, *Uzbekujo*, *Uzbekio*. Legu pli detale pri nomoj de landoj kaj popoloj en §35.4.

### 39.1.20. IT

Ekssufikso en iuj vortoj por inflamoj: *nefrito*, *oftalmito*, *encefalito*, *dermatito*, *otito*.

#### Vera sufikso

"Inflamo". Uzata en medicino kiel vera sufikso post nomo de organo: *orelo* → *orelito* = "orelinflamo, otito". En multaj okazoj ekzistas internacia vorto, kiu ankaŭ povus esti rigardata kiel Esperanta kunmetaĵo kun IT: *bronkito*, *apendicito*, *laringito*, *meningito*, *ostito* k.a. En nefaka lingvaĵo oni prefere uzu la vorton *inflamo* aparte aŭ en kunmetaĵo: *rena inflamo*, *reninflamo*, *orela inflamo*, *orelinflamo* k.t.p. Verŝajne tiaj vortoj estas preferindaj ankaŭ en faka lingvaĵo.

### 39.1.21. IV

Ekssufikso en kelkaj vortoj por kapabloj kaj emoj: *agresiva*, *progresiva*, *konservativa*, *pasiva*.

#### Vera sufikso

"Pova, kapabla". Sufiĉe ofte uzata kiel vera sufikso: *produkti* → *produktiva* = "tia, ke oni povas (multe) produkti", *senti* → *sentiva*, *pagi* → *pagiva*, *krei* → *kreiva*. Oni atentu, ke IV ne estas ĝenerale konata. Preferindaj estas kunmetaĵoj kun EM (§38.2.11) aŭ kun POV kaj KAPABL (§38.4.1) aŭ eĉ simplaj A-vortoj: *produktema*, *sentema*, *sentokapabla*, *pagipova*, *pagpova*, *pagopova*, *kreema*, *krepova*, *produkta*, *senta*, *krea* k.t.p. Ne malofte IV estas misuzata kiel malplena A-vortiga sufikso, precipe *kreiva* ofte estas misuzata anstataŭ *krea* sen rilato al povo aŭ kapablo.

### 39.1.22. IZ

Ekssufikso en multaj radikoj por diversaj metodoj kaj agoj: *judaizi*, *faradizi*, *kaŭterizi*, *legalizi*, *centralizi*, *kateĥizi*, *klimatizi*, *analizi*, *mobilizi*, *organizi*, *sterilizi*.

#### Vera sufikso

1. "Kovri, provizi". Uzata precipe en teĥnika lingvaĵo: *ŝtono* → *ŝtonizi* = "kovri per ŝtonoj (ekz. vojon)", *kupro* → *kuprizi* = "kovri per tavolo de kupro", *gluo* → *gluizi* = "provizi per tavolo de gluo", *elektro* → *elektrizi* = "provizi/funkciigi per elektro". En multaj okazoj la simpla sensufiksa verbo jam havas tian ĉi signifon, ekz. *kupri* = *kuprizi*. Se la simpla verbo havas alian signifon, oni ofte povas uzi la sufikson UM (§38.2.31), ekz. *glumi* (*glui* = "fiksi per gluo"). Iafoje IG (§38.2.17) estas taŭga: *hipnoto* = "speco de dormosimila mensostato" → *hipnotizi* aŭ pli bone *hipnotigi* = "meti en hipnoton". La formon *hipnotizi* oni pli ĝuste rigardu kiel nekunmetitan. En teĥnika lingvaĵo IZ eble povas esti utila, sed ordinare oni ĝin evitu.

2. “Uzi metodon” (post nomo). Iafoje uzata por metodo elpensita de fama persono: *Pasteŭro* → *pasteŭrizi* = “parte sterilizi trinkaĵon per metodo inventita de Pasteŭro”, *Makadamo* → *makadamizi*. Tiaj IZ-vortoj prefere estu rigardataj kiel nekunmetitaj, kaj plej ofte simpla sensufiksa verbo estas pli bona elekto: *pasteŭri*, *makadami*.

### 39.1.23. J° kaj PJ°

J° kaj PJ° estas proponitaj karesnomaj sufiksoj ankoraŭ nur eksperimente uzataj. J° kaj PJ° funkcias same kiel la oficialaj karesnomaj sufiksoj ĈJ (§38.2.6) kaj NJ (§38.2.25). Antaŭ ili oni uzas mallongigitan formon de la nomo. Kutime oni konservas ĉirkaŭ 1 ĝis 5 literojn.

#### J°

Per la sufikso J° oni povas fari karesajn nomojn sen esprimi ion pri sekso: *Alekso* → *Alejo*, *pupo* → *pupjo* (karesa nomo por pupo sen difinita sekso).

La sufikso J° estis unue proponita jam en 1932, sed multaj memstare ĝin re-elpensis lastatempe (pli-malpli ekde la jaro 2010). La elekto de “j” por tia rolo estas sufiĉe evidenta, ĉar “j” estas komuna al ĈJ kaj NJ.

#### PJ°

Per la sufikso PJ oni povas fari karesajn nomojn por neduumaj homoj (kiuj estas nek viroj, nek virinoj, aŭ eble sekse ambiguaj): *Alekso* → *Alepjo*.

La sufikso PJ estis proponita en la jaro 2019.

Legu ankaŭ pri seksa signifo de radikoj kaj O-vortoj en §4.3, la proponita virseksa sufikso IĈ° (§39.1.13), la proponita neduuma sufikso IP° (§39.1.18), kaj la sekse neŭtrala unu-nombra pronomo *ri*° (§11.5).

### 39.1.24. NOMIAL

Evitinda matematika sufikso por esprimoj kun certa nombro de termoj ligitaj per plus aŭ minus: **dunomialo** = “duterma esprimo, dutermo, binomo”, **trinomialo** = “triterma esprimo, tritermo”, **plurnomialo** = “plurterma esprimo, plurtermo”. Prefere oni uzi kunmetaĵojn kun la vorto *termo*: *dutermo*, *plurtermo*.

### 39.1.25. OFON°

“Lingvano”. Tute superflua kaj evitenda sufikso iafoje uzata por fari vorton por lingvano aŭ lingvaneco: *Esperanto* → **esperantofono** = “esperantisto, esperantolingvano”, → **esperantofona** = “esperantlingva”. Oni uzu kun-metaĵojn kun *lingvano*, *lingva*, *parolanto* k.s. Por “parolanto de Esperanto” la ĝusta vorto estas simple *esperantisto*, kiu ĉiam signifas precize “persono, kiu scias kaj uzas Esperanton”.

### 39.1.26. OID (kaj OJD°)

Ekssufikso en diversaj vortoj, ofte kun la signifo “similaĵo” aŭ “simila”: *asteroido*, *sigmoido*, *celuloido*, *skizoida*.

#### Vera sufikso

1. “Similformaĵo, similaĵo”. Iafoje uzata kiel vera sufikso: *rimo → rimoido* = “preskaŭrimo”, *sufikso → sufiksoido* = “ordinara radiko, kiu tamen estas rigardata kiel sufikso”. En matematiko pluraj vortoj por surfacoj kaj kurboj estas OID-vortoj: *elipso → elipsoido* = “surfaco kun tia formo, ke ebena sekco de ĝi estas elipso”, *ciklo → cikloido* = “kurbo farita de punkto sur la cirkonferenco de cirklo, kiu ciklas (ruliĝas) sur rekto”. Plej multaj tiaj ĉi OID-vortoj ankaŭ povas esti rigardataj kiel nekunmetitaj.

2. “Subfamilio” (post plantonomo), “grupo, genro k.s. de similaj bestoj” (post bestonomo). Uzata post tipa membro de la subfamilio aŭ grupo: *asfodelo → asfodeloidoj* = “la subfamilio de asfodelosimilaj plantoj”, *asterio → asterioidoj* = “klaso de asterisimilaj bestoj”. Oni uzu OID por subfamilio nur laŭ la internaciaj botanikaj kaj zoologiaj nomreguloj. OID respondas al la latina sufikso “*-oideae*”. Prefere oni rigardu tiajn vortojn kiel nekunmetitajn. Komparu kun AC (§39.1.2), AL (§39.1.3), E (§39.1.7), ED (§39.1.8) kaj EN (§39.1.9).

Oni proponis la formon OJD° anstataŭ OID (kaj kiel ekssufikson, kaj kiel veran sufikson) pro tio, ke OID-vortoj povus simili al vortoj kun la oficiala sufikso ID (§38.2.16), sed OJD estas nur maloftege uzata.

### 39.1.27. OL

Muzika sufikso uzata ĉe nombraj vortetoj por fari vortojn por diversaj ritmaj subdividoj: *du → duolo* = “du tonoj/batoj en la tempo de tri samspecaj”, *tri → triolo* = “tri tonoj/batoj en la tempo de du samspecaj”, *kvar → kvarolo* = “kvar tonoj/batoj en la tempo de tri aŭ ses samspecaj”. Oni povus rigardi kelkajn tiajn OL-vortojn kiel nekunmetitajn, sed teorie la OL-vortoj estas senlime multaj, kaj iujn el ili oni neeviteble devas rigardi kiel Esperantajn kunmetaĵojn: *sesolo*, *sepolo*, *naŭolo*, *dekolo*, *dekunuolo* k.t.p. Komparu kun T (§39.1.34) kaj TET (§39.1.35).

### 39.1.28. OLOG

Ekssufikso en multaj radikoj por diversaj fakuloj kaj specialistoj: *psikologo*, *antropologo*, *sociologo*, *ornitologo*. Preskaŭ ĉiam ekzistas paralela radiko finiĝanta per “ologi” por la fako (vidu OLOGI, §39.1.29). Anstataŭ la “olog”-vortoj oni povas uzi la respondan “ologi”-vorton plus la sufikson IST (§38.2.24): *psikologiisto*, *antropologiisto* k.t.p. Pro la longeco de tiaj vortoj, kaj pro la malagrablaj duoblaj “i”, oni normale preferas la “olog”-vortojn.

#### Vera sufikso

“Fakulo, specialisto”. Iafoje uzata kiel vera sufikso por diversaj fakuloj: *kancero → kancerologo* = “kancerspecialisto, onkologo”, *birdo → birdologo* = “birdospecialisto, ornitologo”, *Esperanto → esperantologo*

= “persono, kiu science studas Esperanton”. Oni uzas OLOG preskaŭ nur kiam ekzistas responda internacia vorto, kiu finiĝas per “olog”, alie oni preferas IST (§38.2.24) aŭ apartan radikon. Se entute eble, oni prefere rigardu tiajn vortojn kiel nekunmetitajn. Vidu ankaŭ OLOGI (§39.1.29).

### 39.1.29. OLOGI

Ekssufikso en multaj radikoj por diversaj sciencoj, fakoj k.s.: *psikologio*, *antropologio*, *sociologio*, *ornitologio*, *topologio*. Preskaŭ ĉiam ekzistas paralela radiko finiĝanta per “olog” por la fakulo (vidu OLOG, §39.1.28).

#### Vera sufikso

“Fako, scienco” k.s. Uzata paralele al OLOG por diversaj fakoj kaj sciencoj: *kancero → kancerologio* = “kancerstudado, onkologio”, *birdo → birdologio* = “birdostudado, ornitologio”, *Esperanto → Esperantologio* = “scienca esplorado de Esperanto”. Oni uzas OLOGI preskaŭ nur kiam ekzistas responda internacia vorto, kiu finiĝas per “ologi”. Se entute eble, oni prefere rigardu tiajn vortojn kiel nekunmetitajn. Se la internacia vorto finiĝas per “ik”, oni preferas la samsignifan sufikson IK (§39.1.15).

### 39.1.30. OMETR°

Ekssufikso en vortoj por diversaj mezuriloj (iafoje la unua vokalo estas alia ol “o”): *barometro*, *mikrometro*, *fotometro*, *altimetro*, *ampermetro*.

#### Vera sufikso

“Mezurilo”. Kelkfoje uzata kiel vera sufikso: *alto → *altometro**, *pluvo → *pluvometro**. Oni uzu anstataŭe kunmetaĵojn kun *mezurilo* pro la risko de konfuzo kun la vorto *metro* (mezurunuo de longo): *altomezurilo*, *altecmezurilo*, *pluvomezurilo*.

### 39.1.31. OMETRI°

Ekssufikso en vortoj, kiuj iel rilatas al mezurado (iafoje la unua vokalo estas alia ol “o”): *geometrio*, *hidrometrio*, *fotometrio*, *trigonometrio*, *simetrio*, *kalorimetrio*.

#### Vera sufikso

“Scienca mezurado”. Kelkfoje uzata kiel vera sufikso: *alto → *altometrio**, *denso → *densometrio**. Oni uzu kunmetaĵojn kun *mezurado*: *altomezurado*, *altecmezurado*, *densomezurado*.

### 39.1.32. OTEK°

Ekssufikso en vortoj por diversaj kolektoj aŭ kolektejoj: *biblioteko*, *diskoteko*, *pinakoteko*, *apoteko*, *gliptoteko*. Notu bone, ke tiuj vortoj estas nekunmetitaj. Ekz. *biblioteko* neniel rilatas al la Biblio. Historie ĝi signifas “librokolektejo”, de la greka vorto “biblion”, kiu signifas “libro”.

#### Vera sufikso

“Kolekto, kolektejo, kolektujo”. Okaze uzata kiel vera sufikso: *libro → *libroteko** = “librokolekto, librokolektejo, librokolektujo”, *filmo →*

**filmoteko**. Oni uzu kunmetaĵojn kun *kolekto*, *kolektejo*, *kolektujo*, kiuj estas multe pli klaraj: *librokolekto*, *filmokolekto* k.t.p. Oni ankaŭ atentu pri la risko de konfuzo kun la vorto *teko* ("subbrake portebla kolektujo de paperoj kaj libroj").

### 39.1.33. OZ

Ekssufikso en multaj medicinaj kaj botanikaj nomoj de malsanoj: *sklerozo*, *mikozo*, *koniozo*, *iktiozo*, *leŭkozo*, *bakteriozo*. Ŝajnsufikso en multaj vortoj, kie la origina signifo estis "plena, hava, riĉa" aŭ simile: *furioza*, *grandioza*, *celulozo*, *mukozo*.

#### Vera sufikso

1. "Malsano, difekto, perturbo". Iafoje uzata kiel vera sufikso: *viruso* → *virusozo* = "virusmalsano", *fungo* → *fungozo* = "parazita malsano kaŭzita de fungoj, mikozo". Normale oni uzas internaciajn nekunmetitajn radikojn, sed ofte la internacia vorto ankaŭ povas esti rigardata kiel Esperanta kunmetaĵo: *nervoza*, *psikozo*, *acidozo*, *tuberkulozo*. Kiam ne ekzistas responda internacia vorto, estas preferinde uzi kunmetaĵojn kun "malsano": *virusmalsano*, *fungomalsano* k.t.p.

2. "Plena, hava, riĉa". Iafoje uzata kiel vera sufikso: *sablo* → **sabloza** = "riĉa je sablo", *poro* → **poroza**, *suko* → **sukoza**, *suno* → **sunoza**. Oni uzu kunmetaĵojn kun HAV, PLEN kaj RIĈ (§38.4.1) aŭ simplajn A-vortojn sen sufikso: *sabloriĉa*, *sabla*, *porhava*, *pora*, *sukoplena*, *suka*, *suna*.

### 39.1.34. T

"Muzika intervalo". Uzata ĉe nombraj vortetoj por fari nomojn de muzikaj intervaloj: *du* → *duto* = "sekundo", *tri* → *trito* = "tercio", *kvar* → *kvarto*, *kvin* → *kvinto*, *ses* → *sesto* = "seksto", *sep* → *septo* = "septimo", *ok* → *okto* = "oktavo", *naŭ* → *naŭto* = "naŭno" k.t.p. Per T oni povas krei nomojn por ĉiaj ajn ekstremaj intervaloj, kiuj apenaŭ havas aliajn nomojn: *dekto*, *dekunuto*, *dekduto*, *dektrito* k.t.p. Komparu kun OL (§39.1.27) kaj TET (§39.1.35).

### 39.1.35. TET

"Muzikaĵo por grupo kun certa nombro de muzikistoj". Proponita por uzo ĉe nombraj vortetoj: *du* → *duteto* = "muzikaĵo por duopo", *tri* → *triteto*, *kvar* → *kvarteto*, *kvin* → *kvinteto* k.t.p. Jam ekzistas la nekunmetitaj (internaciaj) vortoj *dueto* (2), *terceto* (3), *kvarteto* (4), *kvinteto* (5), *seksteto*° (6), *septeto* (7) kaj *okteto* (8), el kiuj kelkaj estas samformaj kun la responda vorto farita per la sufikso TET. Kaj la nekunmetitaj vortoj, kaj tiuj formitaj per TET, estas iafoje uzataj ankaŭ por grupo el tiom da muzikistoj. Estas preferinde uzi la sufiksojn OP (§38.2.28) kaj AĴ (§38.2.3): *duopo*, *triopo*, *kvaropo* k.t.p. por grupoj; *duopaĵo*, *triopaĵo*, *kvaropaĵo* k.t.p. por muzikaĵoj. Komparu kun OL (§39.1.27) kaj T (§39.1.34).

### 39.1.36. UK°

“Kastrita virbesto”. Proponita sed malmulte uzata sufikso: *bovo* → **bovuko** = “kastrita bovo”, *virkato* → **virkatuko**. Eventuale oni povus uzi UK ankaŭ por “bestino kies generpovo estas (intence) forigita”: *ĉevalino* → **ĉevalinuko**. Normale oni uzas la prefikson EKS (§38.3.5): *eksvirkato*, *ekskoko*, *eksĉevalino*.

## 39.2. Neoficialaj prefiksoj

### 39.2.1. AFRO°

Prefiksa mallongigo de *Afriko* apenaŭ uzata praktike: **afromodo** = “modo inspirita de Afriko”, **afro-azia** = “afrika kaj azia”, **afroamerikano** = “amerikano de afrika deveno”, **afropavo** = “speco de pavo”. Komparu kun EŬRO (§39.2.9).

### 39.2.2. ANTI

Eksprefikso en multaj vortoj kun ia kontraŭeca signifo: *antibiotiko*, *antidoto*, *antipatio*, *antisemito*, *antipodo*. En iuj vortoj temas pri la signifo “antaŭ”: *anticipi*, *Antilebanono*, *antifono*.

#### Vera prefikso

“Kontraŭa, malamika, opozicia”. Iafoje uzata kiel vera prefikso, precipe kiam ekzistas responda internacia vorto, kiu komenciĝas per “anti”: *faŝisto* → *antifaŝisto* = “malamiko de faŝismo”, *Kristo* → *Antikristo* = “iam aperonta kontraŭulo de Kristo”, *tezo* → *antitezo* = “kontraŭtezo, malo”, *materio* → *antimaterio* = “materio el inverse ŝargitaj partikloj”, *tusi* → *antitusa* = “kontraŭtusa”. Vortoj kiel *antitusa* ŝajnas esti frazetvortoj kun kaŝita uzo de ANTI kiel rolvorteto: **anti tuso** = “kontraŭ tuso” → [*anti tuso*]-A → **antitusa** (komparu kun simila uzo de PRE, §39.2.19).

Plej ofte estas preferinde uzi la rolvorteton *kontraŭ* (§12.3.4.8) prefiksece: *kontraŭfaŝisto*, *kontraŭtezo*, *kontraŭtusa* k.t.p. Sed vortoj kiel *antimaterio* kaj *antipartiklo*, en kiuj ANTI havas specialan fakan sencon de fiziko, estas tute aprobindaj.

Multaj ANTI-vortoj ankaŭ povas esti rigardataj kiel nekunmetitaj.

### 39.2.3. ARĤI/ARKI

Ĉiuj vortoj kun ARĤI ekzistas ankaŭ en varianto kun ARKI (legu pli pri alternativoj al Ĥ-vortoj en §2.1).

Eksprefikso en kelkaj vortoj, kiuj origine enhavis la signifon “la unua, la ĉefa, la supera, la plej grava”: *arĥipelago*, *arĥitekto*, *arĥitravo*.

#### Vera prefikso

Iafoje uzata kiel vera prefikso anstataŭ ĈEF (§38.3.2): *episkopo* → *arĥiepiskopo* = “ĉefepiskopo”, *anĝelo* → *arĥianĝelo* = “ĉefanĝelo”, *diakono* → *arĥidiakono* = “ĉefdiakono”, *fripono* → *arĥifripono*[Rz.84] = “ĉeffripono”. Normale oni uzas ARĤI nur kiam ekzistas responda internacia vorto, kiu

komenciĝas per “arĥi”, alie oni ĉiam uzas la prefikson ĈEF. Tamen Zamenhof uzis *arĥifripono*, kiu estas pure Esperanta. Komparu kun PROTO (§39.2.20).

### 39.2.4. AŬDIO°

“Teĥniko de elektronika registrado kaj reproduktado de sono”. Proponita teĥnika prefikso: *teĥniko → aŭdioteĥniko*, *disko → aŭdiodisko*.

Estas pli bone uzi la radikon AŬDI°, per kiu oni povas fari vortojn kiel *aŭdio*, *aŭdia*, *aŭdi(o) teĥniko*, *aŭdi(o) disko*, *aŭdi(o) registrilo*. La ligfinaĵo O estas ĉiam superflua, se temas pri la radiko AŬDI. Se temas pri la prefikso AŬDIO, la “o” estas tamen parto de la prefikso, kaj ne povas forfali. En nefaka lingvaĵo oni ofte povas uzi SON, sed SON ne vere esprimas la specialan signifon de AŬDI°: *sonteĥniko*, *sondisko*, *sonregistrilo*. Komparu kun VIDEO° (§39.2.29).

### 39.2.5. AŬTO°

Eksprefikso en multaj radikoj kun la signifo “(per si) mem, propra”: *aŭtodidakto*, *aŭtogiro*, *aŭtografo*, *aŭtoklavo*, *aŭtomato*, *aŭtobiografio*, *aŭtomobilo*.

#### Vera prefikso

“Aŭtomata”. Aperas iafoje (tre malofte) kiel vera prefikso: *piloto → *aŭtopiloto** = “pilotaŭtomato en aviadilo”, *respondilo → *aŭtorespondilo** = “aŭtomata respondilo de telefono”. AŬTO estas evitenda pro la risko de konfuzo kun la vorto *aŭto* (mallongigo de *aŭtomobilo*). Nepre uzu *aŭtomata* aŭ *aŭtomato*.

### 39.2.6. BIO

Eksprefikso kun la signifo “vivo” aŭ “vivanta estaĵo”: *biografio*, *biologo*, *biopsio*, *biotopo*.

#### Vera prefikso

Iafoje rigardebla kiel vera prefikso en kelkaj modernaj vortoj: *ĥemio → bioĥemio* = “ĥemio de vivantaj estaĵoj”, *fiziko → biofiziko* = “biologia fiziko”, *industrio → bioindustrio* = “industria bestobredado”, *maso → biomaso* = “maso de vivantaj estaĵoj (en unu loko)”, *diverseco → biodiverseco* = “diverseco de vivantaj estaĵoj”. La preciza signifo de BIO estas iafoje malklara. Normale temas pri “vivanta estaĵo”, sed iafoje eble pri “vivo”, “viva proceso” aŭ eĉ “biologio”. Plej multaj BIO-vortoj ankaŭ povas esti rigardataj kiel nekunmetitaj.

### 39.2.7. DES

“Senigado”. Proponita sed malmulte uzata prefikso: *infekti → *desinfekti** = “malinfekti, seninfektigi”, *odoro → *desodori** = “senodorigi”, *herbo → *desherbi** = “senherbigi”. Oni uzu la prefikson MAL (§38.3.7) aŭ kunmetaĵon kun *sen* (§12.3.6.12) kaj IG (§38.2.17). Relative ofta estas nur la

formo *desinfekti*, kiu povas esti akceptebla, se oni rigardas DESINFEKT kiel unu radikon, sed *malinfekti* kaj *seninfektigi* estas klare preferindaj.

### 39.2.8. EKO

Prefiksa mallongigo de "ekologia" aŭ "laŭekologia" uzata en kelkaj modernaj vortoj: *sistemo → ekosistemo* = "ekologia sistemo", *turismo → ekoturismo* = "turismo, kiu ne minacas la naturmedion", *katastrofo → ekokatastrofo* = "katastrofo en naturmedio".

### 39.2.9. EŬRO°

Eksprefikso en kelkaj vortoj, kiuj estas (ekster-Esperantaj) kuniĝoj de la vorto *Eŭropo* kaj iu alia vorto. La "o" normale malaperas antaŭ vokalo: *Eŭrovizio* = "eŭropa televizio", *Eŭroporto* (haveno en Roterdamo), *Eŭrazio* = "Eŭropo kaj Azio".

#### Vera prefikso

Mallongigo de "Eŭropo" (aŭ "Eŭropa Unio") iafoje uzata kiel vera prefikso: **Eŭrotunelo** (tunelo inter Francujo kaj Britujo), **eŭrokomunismo** = "okcident-eŭropa varianto de komunismo". Se temas pri vera Esperanta prefikso, la "o" ĉiam restas, kaj la posta radiko estas ĉiam kompleta Esperanta radiko. Komparu kun AFRO (§39.2.1).

Nun *eŭro* (kiel memstara vorto) estas nomo de monunuo. Por eviti konfuzon oni do ne plu uzu la prefikson EŬRO kun la signifo "Eŭropo". Oni uzu nur la plenan radikon EŬROP en Esperantaj kunmetaĵoj.

### 39.2.10. HIPER

Eksprefikso en iuj vortoj, kiuj origine iel enhavis la signifon "super", "tro" aŭ "trans": *hiperbolo*, *hipermetropa*, *hiperteksto*, *hipertrofio*, *hipernovao*, *Hiperboreo*.

#### Vera prefikso

Iafoje uzata kiel vera prefikso en sciencaj vortoj kun ia signifo rilata al "super", "tro" aŭ "trans": *acideco → hiperacideco* = "tromulteco de acido en stomako", *reala → hiperrealismo* = "artostilo kun detaleco pli granda ol rigardado de la realo". Estas preferinde uzi *super* aŭ *tro* prefiksece (ekz. *superacideco*, *troacideco*, *superrealismo*).

### 39.2.11. INFRA

"Sub". Prefikso en iaj teĥnikaj vortoj, por kiuj ekzistas responda internacia vorto, kiu komenciĝas per "infra": *sono → infrasono* = "sono tiel malaltfrekvenca, ke ĝi estas neaŭdebla", *strukturo → infrastrukturo* = "subtena strukturo de organizo aŭ socio", *ruĝa → infraruĝa* = "transruĝa". Normale oni uzu *sub*: *subsono*, *substrukturo*. Anstataŭ *infraruĝa* oni diru *transruĝa*. Komparu kun ULTRA (§39.2.28).

### 39.2.12. KO

Eksprefikso en multaj vortoj kun ia signifo “kun”: *koalicii*, *koeficiento*, *koheri*, *koincidi*, *kooperativo*, *korelativa*.

#### Vera prefikso

Uzata en matematiko kiel vera prefikso kun diversaj specialaj signifoj iel rilataj al “komplemento” aŭ “kun”: *sinuso* → *kosinuso* = “sinuso de la komplementa angulo”, *sekanto* → *kosekanto* = “la inverso de la sinuso”. Plej multaj tiaj KO-vortoj ankaŭ povas esti rigardataj kiel nekunmetitaj.

### 39.2.13. KVER

“Transversa”. Iafoje uzata teĥnika prefikso: *profilo* → *kverprofilo* = “transversa profilo”, *sekco* → *kversekco*, *fluto* → *kverfluto*. Normale oni uzas *transversa*.

### 39.2.14. MAKRO

Eksprefikso en kelkaj vortoj kun la signifo “grandega” k.s.: *makrocefalo*, *makrobiotiko*.

#### Vera prefikso

“Grandskala, grandega”. Kelkfoje rigardebla kiel vera prefikso: *molekulo* → *makromolekulo* = “molekulo kun alta molekulpezo”, *kosmo* → *makrokosmo* = “universo”. Plej multaj tiaj MAKRO-vortoj ankaŭ povas esti rigardataj kiel nekunmetitaj. Komparu kun MIKRO (§39.2.16).

### 39.2.15. META

Eksprefikso en kelkaj vortoj kun signifoj kiel “trans, super, inter, malantaŭ, post” k.s.: *metamorfozo*, *metaforo*, *metabolo*, *metakarpo*, *metamero*.

#### Vera prefikso

Uzata kiel vera prefikso en vortoj por sciencaj, artaj kaj similaj agadoj kaj kreaĵoj, kiuj iel temas pri si mem, pri la propra scienco, arto k.t.p.: *filozofio* → *metafilozofio* = “filozofia teorio pri filozofia pensado”, *sciado* → *metasciado* = “sciado de la propraj scioj kaj pensoj”, *poezio* → *metapoezio* = “poezio, kiu temas pri poezio kaj kreado de poezio”, *lingvo* → *metalingvo* = “lingvo uzata por paroli pri lingvaj fenomenoj”. (Rimarku, ke la nekunmetita vorto *metafiziko* ne estas tia ĉi META-vorto. Ĝi ne estas “fiziko pri fiziko”, sed filozofio pri la plej bazaj kaŭzoj kaj principoj de ĉio.)

### 39.2.16. MIKRO

Eksprefikso en kelkaj vortoj kun la signifo “malgrandega”: *mikrocefalo*, *mikroskopo*, *mikrobo*.

#### Vera prefikso

1. “Malgrandskala, malgrandega”. Kelkfoje rigardebla kiel vera prefikso: *filmo* → *mikrofilmo* = “filmo kun ekstreme malgrandaj fotoj”, *organismo* → *mikroorganismo* = “ekstreme malgranda organismo”, *ondo* → *mikroondo*

= "tre mallonga elektra ondo", *forno* → *mikroforno* = "forno uzanta mikro-ondojn". Plej multaj MIKRO-vortoj ankaŭ povas esti rigardataj kiel nekun-metitaj.

2. "Milion-ono". Uzata nur antaŭ mezurunuoj (§39.3).

Komparu kun MAKRO (§39.2.14).

### 39.2.17. MINI

"Tre malgranda/mallonga/malalta" k.s. Iafoje uzata prefikso por montri tre malgrandan specon: *jupo* → *minijupo* = "tre mallonga jupo", *krozo* → *minikrozo* = "mallongigita krozo", *golfo* → *minigolfo* = "malgrandskala varianto de la ludo golfo", *novelo* → *mininovelo* = "tre mallonga novelo". Principe la sufikso ET (§38.2.15) same bone taŭgas (*jupeto*, *krozeto*, *golfeto*), sed verŝajne multaj MINI-vortoj estas neeviteblaj, kiam ekzistas responda internacia vorto, kiu komenciĝas per "mini".

### 39.2.18. MONO

Eksprefikso en kelkaj vortoj kun la signifo "unu, unuopa": *monolito*, *monologo*, *monoteismo*, *monofonio*°, *monomo*.

#### Vera prefikso

"Unu". Iafoje uzata kiel vera prefikso: *relo* → **monorelo** = "unurela fervojo", *silabo* → **monosilaba** = "unusilaba". Atentu pri la risko de konfuzo kun la vorto *mono* (pagilo). Oni uzu kunmetaĵojn kun *unu*: *unurelo*, *unurela fervojo*, *unusilaba*.

Iafoje oni renkontas la memstaran vorton **mono**° kiel mallongigon de *monofonio*°. Ĝi estas evitenda pro la kolizio kun la ordinara vorto *mono* (pagilo). La responda mallongigo *stereo*° por *stereofonio* estas tamen uzebla (sed oni atentu pri la akcento: *sterẹo*). Se entute mallongigi *monofonio*, oni uzu la formon *monoo*°.

### 39.2.19. PRE

Eksprefikso en multaj vortoj kun la signifo "antaŭ": *prefaco*, *prefikso*, *prelego*, *premiso*, *prepozicio* = "rolvorteto".

#### Vera prefikso

"Antaŭ, senpere antaŭ". Iafoje uzata eksperimente anstataŭ *antaŭ* en tempa signifo: *amplifi* → **preamplifilo** = "antaŭamplifilo", *scienco* → **prescienca** = "de la tempo antaŭ la apero de scienco", *latina* → **prelatina** = "de la tempo antaŭ Latino", *kancero* → **prekancera** = "antaŭkancera, montranta aperontan kanceron". Ŝajnas, ke iuj tiaj vortoj vere estas frazetvortoj kun kaŝita uzo de PRE kiel rolvorteto: **pre la scienco** = "antaŭ la scienco" → [*pre scienco*]-A → **prescienca**, **pre Latino** = "antaŭ Latino" → [*pre Latino*]-A → **prelatina** (komparu kun simila uzo de ANTI, §39.2.2). PRE estas evitenda, ĉu kiel prefikso, ĉu kiel (kaŝita) rolvorteto. Oni uzu *antaŭ*. Komparu kun la oficiala prefikso PRA (§38.3.9).

### 39.2.20. PROTO

Eksprefikso en kelkaj vortoj kun la signifo "ĉefa, plej unua, primitiva, origina": *protozoo*, *protoplasmo*, *protono*.

#### Vera prefikso

"Ĉefa, plej unua, primitiva, origina". Iafoje uzata kiel vera prefikso: *tipo* → *prototipo* = "unua tipo, unua ekzemplero", *infektiĝo* → *protoinfektiĝo* = "unuafoja infektiĝo", *kanajlo* → *protokanajlo* [Rz.84] = "kanajlo modela/origina". Plej multaj PROTO-vortoj ankaŭ povas esti rigardataj kiel nekunmetitaj, sed en la zamenhofa vorto *protokanajlo* PROTO sendube estas vera prefikso. Komparu kun ARĤI (§39.2.3).

### 39.2.21. PSEŬDO

Eksprefikso en kelkaj vortoj kun la signifo "malvera, neaŭtentika": *pseŭdonimo*, *pseŭdopodo*.

#### Vera prefikso

"Malvera, neaŭtentika, kaŝita". Sufiĉe ofte uzata kiel vera prefikso: *sufikso* → *pseŭdosufikso* [LR.52A], *scienca* → *pseŭdo-scienca* [FK.263], *laboro* → *pseŭdolaboro* [M.138], *nomo* → *pseŭdonomo* = "pseŭdonimo, plumnomo", *argumento* → *pseŭdoargumento*. Zamenhof ofte uzis PSEŬDO kiel veran prefikson, sed estas tamen pli bone uzi KAŜ, ŜAJN aŭ *kvazaŭ*, ĉar tio estas multe pli klara: *kaŝnomo*, *ŝajnsufikso*, *kvazaŭscienco*, *ŝajnlaboro*, *ŝajnargumento*, *malvera argumento*.

Iafoje oni vidas la A-vorton **pseŭda**. A-vorta formo de PSEŬDO estu tamen *pseŭdoa*. La "o" estas parto de la radiko, kaj ne povas malaperi. Kaj **pseŭda** kaj *pseŭdoa* estas superfluaj. Uzu *neaŭtentika*, *malvera*, *kaŝita*, *ŝajna* aŭ *iluzia*.

### 39.2.22. RETRO

"En la kontraŭa direkto, en la malkutima direkto". Sufiĉe ofte uzata kiel pli preciza alternativo al la prefikso RE (§38.3.10), kiu havas ankaŭ aliajn signifojn: *iri* → *retroiri* = "iri dorsdirekte", *fleksi* → *retrofleksi* = "fleksi en kontraŭa direkto", *aktiva* → *retroaktiva* = "aktiva aŭ valida por jam pasinta tempo".

Iafoje oni provis uzi RETRO kiel memstaran vorteton kun la signifo "reen": *Iru retro, Satano!* Oni uzu prefere *reen*.

### 39.2.23. SAN

Eksprefikso en multaj loknomoj kun la signifo "sankta": *Sanfrancisko*, *Sanremo*, *Sanjoseo*, *Sanmarino*.

#### Vera prefikso

"Sankta". Iafoje uzata kiel vera prefikso en esperantigitaj loknomoj: *Santo Domingo* → **Sandomingo**; *Saint-Pierre* → **Sanpiero**°; *Saint Helena* → **Sanheleno**°. Tiaj formoj estas evitindaj miksaĵoj. Oni aŭ traduku per la plena Esperanta radiko SANKT, aŭ oni rekte esperantigu la efektivan naci-

lingvan formon: *Sankta Domingo* aŭ *Santodomingo*; *Sankta Petro*, *Sankt-Petro* aŭ *Sentpiero°*; *Sankta Heleno* aŭ *Sentheleno°*. La portugalan formon "*São*" oni ordinare esperantigas kiel "San": *São Paulo* → *Sanpaŭlo* ("San" tie ne estas Esperanta prefikso, sed parto de la radiko). Kompreneble oni ankaŭ povas uzi la nacilingvan formon de tiaj ĉi nomoj senŝanĝe.

### 39.2.24. SEMI (kaj HEMI)

"Duona". SEMI estas sufiĉe ofte uzata anstataŭ DUON, kiam ekzistas responda internacia vorto, kiu komenciĝas per "semi": *nomado* → **seminomado**, *vokalo* → **semivokalo**, *cirklo* → **semicirklo**. SEMI estas superflua. Oni uzu kunmetaĵojn kun DUON.

Same superflue estus uzi HEMI kiel veran Esperantan prefikson. HEMI estas tamen eksprefikso kun la signifo "duona" en kelkaj vortoj: *hemianopsio*, *hemikranio*, *hemiplegio*, *hemisfero*.

### 39.2.25. STIF°

Apenaŭ uzata prefikso proponita por uzo anstataŭ prefikseca DUON aŭ prefikseca VIC en iaj parencvortoj (§38.4.1).

### 39.2.26. TELE

Eksprefikso en multaj vortoj kun la signifo "longdistanca": *telefono*, *telegrafo*, *telekinezo*, *teleskopo*, *televizio*.

#### Vera prefikso

"Longdistance (per ia teĥniko), per longdistanca komunikilo". Tre ofte uzata kiel vera prefikso: *vidi* → *televidi* = "vidi per televizio", *komuniki* → *telekomuniki* = "komuniki longdistance per ia teĥniko", *objektivo* → *teleobjektivo* = "fotografa objektivo por longa distanco", *regilo* → *teleregilo* = "ilo por regi aparaton de distanco", *tajpilo* → *teletajpilo* = "telegrafia tajpilo", *kopii* → *telekopii*, *aĉeti* → *teleaĉeti*, *lerni* → *telelerni*. TELE estas tre bezonata en la moderna mondo. Oni senhezite uzu ĝin.

### 39.2.27. TERMO

Eksprefikso en kelkaj vortoj kun la signifo "varmo" (la fina O iafoje mankas): *termostato*, *termoso*, *termometro*, *termika*, *termogena*.

#### Vera prefikso

"Varmo". Iafoje uzata kiel vera prefikso, kiam ekzistas responda internacia vorto, kiu komenciĝas per "termo": *botelo* → **termobotelo** = "termoso", *fonto* → **termofonto** = "fonto de varma mineralakvo", *banejo* → **termobanejo** = "banejo, kie oni kuracas per varma mineralakvo". Atentu pri la risko de konfuzo kun la matematika vorto *termo*. Oni uzu kunmetaĵojn kun VARM: *varmbotelo*, *(kuraca) varmbanejo*, *varmfonto*.

### 39.2.28. ULTRA

"Ekstrema, eksternormala". Teĥnika prefikso uzata, kiam ekzistas responda internacia vorto, kiu komenciĝas per "ultra": *sono* → *ultrasono* = "trans-

sono, sono tiel altfrekvenca, ke ĝi estas neaŭdebla”, *viol(kolor)a* → *ultraviol(kolor)a* = “havanta nevideblan koloron kun ondolongo trans violkoloro”, *konservativa* → *ultrakonservativa*. Normale oni uzu *trans* aŭ *ekstrema*: *transviol(kolor)o*, *transsono*, *ekstreme konservema*. Komparu kun INFRA (§39.2.11).

### 39.2.29. VIDEO°

“Teĥniko de elektronika registrado, konservado, prilaborado kaj reproduktado de moviĝantaj bildoj”. Teĥnika prefikso: *teĥniko* → *videoteĥniko*, *disko* → *videodisko*, *filmo* → *videofilmo*.

Estas pli bone uzi la radikon VIDE, per kiu oni povas fari ekz.: *video*, *videa*, *videilo*, *vide(o)teĥniko*, *vide(o)disko*, *vide(o)filmo*, *vide(o)registrilo*, *vide(o)kamerao* = “kamerao, kiu registras moviĝantajn bildojn elektronike”. La ligfinaĵo O estas ĉiam superflua, se temas pri la radiko VIDE. Se temas pri la prefikso VIDEO, la “o” estas tamen parto de la prefikso, kaj ne povas forfali. En nefaka lingvaĵo oni povas ofte uzi VID anstataŭe, sed VID ne vere esprimas la specialan signifon de VIDE: *vidbendo*, *viddisko*, sed ekz. **vidkamerao** estas sensenca kaj senutila, ĉar ĉiuj specoj de kameraoj estas “vidaj”. Komparu kun AŬDIO° (§39.2.4).

## 39.3. Internaciaj afiksoj

### Prefiksoj de mezurunuoj

Ekzistas internacia sistemo de prefiksoj por mezurunuoj. Ĝi estas parto de la SI-sistemo, “Sistemo Internacia de Unuoj”, prizorgata de “*Bureau International des Poids et Mesures*” (“Internacia Buroo de Pezoj kaj Mezuroj”). Tiuj prefiksoj havas diversajn pligrandigajn kaj malpligrandigajn signifojn. Oni uzu ilin nepre nur antaŭ mezurunuoj kiel *metro*, *gramo*, *ĵulo*, *sekundo*, *litro*, *ampero*, *volto*, *bito* k.s.

Jen la Esperantaj formoj de tiuj internaciaj prefiksoj:

| Prefikso | Valoro | | Simbolo | Ekzemplo |
|---|---|---|---|---|
| KVETA | kvintiliono | $10^{30}$ | Q | *kvetagramo*, Qg, kvintiliono da gramoj |
| RONA | mil kvadrilionoj | $10^{27}$ | R | *ronagramo*, Rg, mil kvadrilionoj da gramoj |
| JOTA | kvadriliono | $10^{24}$ | Y | *jotateslo*, YT, kvadriliono da tesloj |
| ZETA | mil trilionoj | $10^{21}$ | Z | *zetavebero*, ZWb, mil trilionoj da veberoj |
| EKSA | triliono | $10^{18}$ | E | *eksaĵulo*, EJ, triliono da ĵuloj |
| PETA | mil bilionoj | $10^{15}$ | P | *petavolto*, PV, mil bilionoj da voltoj |
| TERA | biliono | $10^{12}$ | T | *teraĵulo*, TJ, biliono da ĵuloj |
| GIGA | miliardo | $10^{9}$ | G | *gigavato*, GW, miliardo da vatoj |
| MEGA | miliono | $10^{6}$ | M | *megaherco*, MHz, miliono da hercoj |
| KILO | mil | $10^{3}$ | k | *kilometro*, km, mil metroj |
| HEKTO | cent | $10^{2}$ | h | *hektogramo*, hg, cent gramoj |
| DEKA | dek | $10^{1}$ | da | *dekalumeno*, dalm, dek lumenoj |
| DECI | dekono | $10^{-1}$ | d | *decimetro*, dm, dekona metro |
| CENTI | centono | $10^{-2}$ | c | *centimetro*, cm, centona metro |

| Prefikso | Valoro | | Simbolo | Ekzemplo |
|---|---|---|---|---|
| MILI | milono | $10^{-3}$ | m | *miligramo*, mg, milona gramo |
| MIKRO | milion-ono | $10^{-6}$ | µ | *mikrometro*, µm, milion-ona metro |
| NANO | miliard-ono | $10^{-9}$ | n | *nanohenro*, nH, miliard-ona henro |
| PIKO | bilion-ono | $10^{-12}$ | p | *pikofarado*, pF, bilion-ona farado |
| FEMTO | mil-bilion-ono | $10^{-15}$ | f | *femtometro*, fm, mil-bilion-ona metro |
| ATO | trilion-ono | $10^{-18}$ | a | *atosekundo*, as, trilion-ona sekundo |
| ZEPTO | mil-trilion-ono | $10^{-21}$ | z | *zeptoĵulo*, zJ, mil-trilion-ona ĵulo |
| JOKTO | kvadrilion-ono | $10^{-24}$ | y | *joktogramo*, yg, kvadrilion-ona gramo |
| RONTO | mil-kvadrilion-ono | $10^{-27}$ | r | *rontogramo*, rg, mil-kvadrilion-ona gramo |
| KVEKTO | kvintilion-ono | $10^{-30}$ | q | *kvektogramo*, qg, kvintilion-ona gramo |

Plej ofte uzataj estas: KILO, HEKTO, DECI, CENTI kaj MILI. La aliaj estas uzataj preskaŭ nur en faka lingvaĵo. La plej novaj, RONA, KVETA, RONTO kaj KVEKTO (enkondukitaj en 2022), estas apenaŭ uzataj entute.

Ĉi tiujn internaciajn prefiksojn oni uzu rigore laŭ la internaciaj principoj. Ne havas sencon krei unike Esperantajn vortojn per ili.

Plej multaj vortoj faritaj per tiuj ĉi prefiksoj estas rigardeblaj kiel memstaraj radikoj en Esperanto. Pluraj el ili estas jam oficialaj, ekz.: *kilogramo*, *decigramo*, *centigramo*, *miligramo*, *decilitro*, *centilitro*, *kilometro*, *centimetro*, *decimetro*, *milimetro*. Sed en kelkaj okazoj estas tamen sendube, ke temas pri efektiva Esperanta kunmetaĵo: *bitoko* (oko da bitoj, bajto) → *kilobitoko* (milo da bitokoj aŭ 1024 bitokoj, kilobajto).

Ekzistas ankaŭ du neregulaj formoj: *hektaro* (cento da aroj) kaj *megomo* (miliono da omoj). Tiuj formoj estas rigardendaj kiel apartaj radikoj en Esperanto: HEKTAR kaj MEGOM. Sed ankaŭ la regulaj kunmetoj *hektoaro* kaj *megaomo* estas uzeblaj.

Iam ekzistis ankaŭ la prefikso MIRIA (dek mil). Per ĝi oni kreis interalie la vorton *miriametro* = "dek mil metroj", kiu eĉ fariĝis oficiala Esperanta radiko, sed nek MIRIA, nek *miriametro* estas plu uzataj.

La simbolo µ estas greka litero (§19), kiu nomiĝas *mu* aŭ *muo*, sed kiam ĝi estas mezurunua prefikso, oni elparolas ĝin kiel *mikro...* La vorto *mikrometro* estas ankaŭ nomo de ia mezurilo de malgrandegaj longoj. Por la mezurunuo *mikrometro* ekzistas la alternativaj nomoj *mikrono* kaj *muo*.

Kiam temas pri la grando de komputila memorilo, oni ofte uzas kelkajn el tiuj ĉi prefiksoj kun iom aliaj valoroj, kiuj baziĝas sur la duuma nombrosistemo uzata en komputiloj: KILO = $2^{10}$, MEGA = $2^{20}$, GIGA = $2^{30}$. Ekz.: *kilobito* = "mil bitoj" aŭ "1024 bitoj", *megabitoko* = "miliono da bitokoj" aŭ "1.048.576 bitokoj", *gigabitoko* = "miliardo da bitokoj" aŭ "1.073.741.824 bitokoj". Por la valoroj bazitaj sur potencoj de 2, la komisiono IEC ("*International Electrotechnical Commission*", "Internacia Elektroteĥnika Komisiono") ellaboris apartajn prefiksojn, kiuj tamen ankoraŭ estas sufiĉe malofte uzataj: KIBI° = $2^{10}$, MEBI° = $2^{20}$, GIBI° = $2^{30}$, TEBI° = $2^{40}$, PEBI° = $2^{50}$, EKSBI° = $2^{60}$, ZEBI° = $2^{70}$, JOBI° = $2^{80}$. Ekz.: *kibibito* = "1024 bitoj", *mebibitoko* = "1.048.576 bitokoj", *gibibitoko* = "1.073.741.824 bitokoj".

## Ĥemiaj afiksoj

Ekzistas internacia faklingva sistemo por fari sistemajn nomojn de ĥemiaj kombinaĵoj. Tiu sistemo enhavas multegajn radikojn kaj afiksojn, kaj specialajn regulojn por kunmeti ilin. Pri la sistemo respondecas la (ne-Esperanta) organizo IUPAC, "*International Union of Pure and Applied Chemistry*" ("Internacia Unio de Pura kaj Aplikata Ĥemio"). Esperanto transprenu la elementojn kaj vortojn de tiu sistemo laŭ la skribaj, elparolaj kaj gramatikaj reguloj de Esperanto, sed sen ia ajn kroma modifo. Ne havas sencon miksi la propre Esperantan vortfaradon kun tiu internacia sistemo. Estas preferinde rigardi vortojn kreitajn per tiu sistemo kiel nekunmetitajn radikojn en Esperanto. Ili estas tamen tro multaj por esti listigitaj komplete en vortaro. Efektive ili estas senlime multaj.

Iuj el la internaciaj ĥemiaj afiksoj havas la saman formon kiel oficiala aŭ neoficiala Esperanta afikso (ekz. AN §38.2.4, AT §28.1, ID §38.2.16, IN §38.2.20, IT §28.1, ON §38.2.27, OL §39.1.27 kaj META §39.2.15), sed ne estas spaco en *PMEG* por pritrakti ĥemian vortfaradon. Oni turnu sin al ĥemiaj faklibroj, sed bedaŭrinde ankoraŭ ne ekzistas unueca maniero esperantigi ĥemiajn vortojn.

# Aldonoj

## 40. Gramatiko en la *Fundamento*

La libro *Fundamento de Esperanto* estas la bazo de Esperanto. Ĝi enhavas ĉapitron kun la nomo *Fundamenta Gramatiko de la Lingvo Esperanto en Kvin Lingvoj*. Tiu ĉapitro enhavas la famajn 16 regulojn. Estas ofta miskompreno, ke Esperanto havas nur 16 regulojn. Fakte la nombro de reguloj estas multege pli granda. Eĉ estas 17 reguloj jam en la *Fundamenta Gramatiko*, ĉar ĝi komenciĝas per instruo pri la alfabeto, kiu ne estas numerita. Krome en la parto *Ekzercaro* troviĝas pli da reguloj, kaj per rektaj instruoj, kaj per ekzemploj.

La *Fundamenta Gramatiko* estas tamen la plej grava gramatika regularo de Esperanto. Ĝi estas la bazo de ĉiuj aliaj reguloj. La teksto povas tamen en kelkaj lokoj ŝajni konfuzita el vidpunkto de moderna lingvoscienco. Oni memoru, ke la teksto estis verkita en la fino de la 19-a jarcento, en tute tradicia stilo, kaj tute el eŭropa vidpunkto. Por ĝuste kompreni la tekston oni ne nur devas havi ĝeneralajn sciojn pri eŭropaj lingvoj, sed oni devas ankaŭ konsideri, ke la tiutempa lingvoscienco estis malpli evoluinta ol la nuntempa. Oni devas kompreni la regulojn laŭ la tiutempa stilo de klarigoj. Por ĝuste kompreni estas ofte absolute necese kompari kun la praktikaj ekzemploj en la *Ekzercaro*. Oni nepre ne provu legi la regulojn kiel matematikecan aŭ logikecan sistemon de aksiomoj, ĉar tiel ili ne estis verkitaj.

La *Fundamenta Gramatiko* en la *Fundamento* estas en la lingvoj franca, angla, germana, rusa kaj pola, sed ne en Esperanto. En la libro *Fundamenta Krestomatio* troviĝas Esperanta versio (p. 239-241), sed tiu versio, kvankam grava, ne estas oficiala leĝodona versio, kiel la versioj en la *Fundamento*.

La kvin nacilingvaj versioj ne estas tute samaj. En iuj versioj troviĝas aferoj, kiuj mankas en aliaj. La Esperanta versio, kiu sekvas ĉi-poste, estas kunmetaĵo de la kvin nacilingvaj tekstoj. Ĝi enhavas ĉiujn regulojn, reguletojn, komentojn kaj ekzemplojn de ĉiuj kvin versioj de la *Fundamenta Gramatiko*, krom la instruoj pri elparolo, kiuj estas ĉi tie forlasitaj. La vortelekto estas grandparte bazita sur la Esperanta versio en la *Fundamenta Krestomatio*. La nacilingvaj versioj enhavas ankaŭ nacilingvajn tradukojn de Esperantaj ekzemploj. Tiuj estas forigitaj krom en du lokoj (reguloj 3 kaj 16).

Por tiuj, kiuj volas detale studi la diferencojn inter la kvin versioj, ekzistas en la naŭa kaj deka eldonoj de la *Fundamento* aldonaĵo nomata *Kompara Teksto de la Kvinlingva Fundamenta Gramatiko*. Tie estas detale montrite, kio troviĝas en kiu versio.

## ***Fundamenta Gramatiko*** en Esperanta traduko

## GRAMATIKO

### A) ALFABETO

A a, B b, C c, Ĉ ĉ, D d, E e, F f, G g, Ĝ ĝ, H h, Ĥ ĥ, I i, J j, Ĵ ĵ, K k, L l, M m, N n, O o, P p, R r, S s, Ŝ ŝ, T t, U u, Ŭ ŭ (uzata en diftongoj), V v, Z z.

**Rimarko 1:** La litero *ŭ* estas uzata nur post vokaloj.

**Rimarko 2:** Presejoj, kiuj ne posedas la literojn *ĉ*, *ĝ*, *ĥ*, *ĵ*, *ŝ*, *ŭ*, povas anstataŭ ili uzi *ch*, *gh*, *hh*, *jh*, *sh*, *u*.

### B) PARTOJ DE PAROLO

**1. Artikolo** nedifinita ne ekzistas; ekzistas nur artikolo difinita, *la*, egala por ĉiuj genroj, kazoj kaj nombroj.

**Rimarko.** La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en la germana, franca kaj aliaj lingvoj. La personoj, por kiuj la uzado de la artikolo prezentas malfacilaĵon, povas tute ĝin ne uzi.

**2. Substantivoj** estas formataj per aldono de *o* al la radiko. Por la formado de la pluralo oni aldonas la finiĝon *j* al la singularo. Kazoj ekzistas nur du: nominativo kaj akuzativo. La radiko kun aldonita *o* estas la nominativo, la akuzativo aldonas *n* post la *o*. La ceteraj kazoj estas esprimataj per helpo de prepozicioj: la genitivo per *de*, la dativo per *al*, la instrumentalo (ablativo) per *per*, aŭ aliaj prepozicioj laŭ la senco. Ekz. radiko *patr*, *la patr|o*, *al la patr|o*, *de la patr|o*, *la patr|o|n*, *por la patr|o*, *kun la patr|o*, *la patr|o|j*, *la patr|o|j|n*, *per la patr|o|j*, *por la patr|o|j*.

**3. Adjektivoj** estas formataj per aldono de *a* al la radiko. Kazoj kaj nombroj kiel ĉe substantivoj. La komparativo estas farata per la vorto *pli*, la superlativo per *plej*. Post la komparativo la vorto “*que*” (france), “*than*” (angle), “*als*” (germane), “чѣмъ” (ruse), “*niż*” (pole) tradukiĝas per *ol*, kaj post la superlativo la vorto “*de*” (france) tradukiĝas per *el*. Ekz. *pli blank|a ol neĝ|o*; *mi hav|as la plej bel|a|n patr|in|o|n el ĉiu|j*; *mi hav|as la plej bon|a|n patr|in|o|n*.

**4.** La bazaj **numeraloj** (ne deklinaciataj) estas: *unu* (1), *du* (2), *tri* (3), *kvar* (4), *kvin* (5), *ses* (6), *sep* (7), *ok* (8), *naŭ* (9), *dek* (10), *cent* (100), *mil* (1000). La dekoj kaj centoj estas formataj per simpla kunigo de la numeraloj. Por la ordaj numeraloj oni aldonas la adjektivan finiĝon *a*; por la multiplikaj – la sufikson *obl*; por la frakciaj – *on*; por la kolektivaj – *op*; por la distribuaj – la vorton *po*. Krom tio povas esti uzataj numeraloj substantivaj kaj adverbaj. Ekz. *kvin|cent tri|dek tri* (533); *kvar|a*, *unu|a*, *du|a*; *unu|o*, *cent|o*; *sep|e*, *unu|e*, *du|e*; *tri|obl|a*; *kvar|on|o*, *du|on|o*; *du|op|e*, *kvar|op|e*; *po kvin*.

**5.** La **pronomoj** personaj estas: *mi*, *vi*, *li*, *ŝi*, *ĝi* (por bestoj aŭ aĵoj), *si*, *ni*, *ili*, *oni* (senpersona plurala pronomo). Pronomoj posedaj estas formataj per aldono de la adjektiva finiĝo *a*. La deklinacio de la pronomoj estas kiel ĉe substantivoj. Ekz. *mi|n*, *mi|a*, *la vi|a|j*.

**6. Verbo** ne estas ŝanĝata laŭ personoj nek nombroj; ekz. *mi far|as*, *la patr|o far|as*, *ili far|as*.

- a) La tempo prezenca finiĝas per *as*; ekz. *mi far|as*.
- b) La tempo preterita per *is*: *vi far|is*, *li far|is*.
- c) La tempo futura per *os*: *ili far|os*.
- ĉ) La modo kondicionala per *us*: *ŝi far|us*.
- d) La modo imperativa per *u*: *far|u*, *ni far|u*.
- e) La modo infinitiva per *i*: *far|i*.

Participoj (kaj gerundioj):

Estas du formoj de participo en la internacia lingvo, la deklinaciebla aŭ adjektiva, kaj la nedeklinaciebla aŭ adverba.

- f) La participo aktiva prezenca finiĝas per *ant*: *far|ant|a*, *far|ant|e*.
- g) La participo aktiva preterita per *int*: *far|int|a*, *far|int|e*.
- ĝ) La participo aktiva futura per *ont*: *far|ont|a*, *far|ont|e*.
- h) La participo pasiva prezenca per *at*: *far|at|a*, *far|at|e*.
- ĥ) La participo pasiva preterita per *it*: *far|it|a*, *far|it|e*.
- i) La participo pasiva futura per *ot*: *far|ot|a*, *far|ot|e*.

Ĉiuj formoj de la pasivo estas formataj per helpo de responda formo de la verbo *est* kaj prezenca aŭ preterita participo pasiva de la bezonata verbo, la prepozicio ĉe la pasivo estas *de*. Ekz. *ŝi est|as am|at|a de ĉiu|j* (participo prezenca: la afero fariĝas); *la pord|o est|as ferm|it|a* (participo preterita: la afero jam estas farita).

**7. Adverboj** estas formataj per aldono de *e* al la radiko. Gradoj de komparado estas la samaj kiel ĉe adjektivoj. Ekz. *mi|a frat|o pli bon|e kant|as ol mi*.

**8.** Ĉiuj **prepozicioj** per si mem postulas la nominativon.

## C) ĜENERALAJ REGULOJ

**9.** Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita. Ne estas neelparolataj literoj.

**10.** La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo.

**11.** Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (radikoj) (la ĉefa vorto staras en la fino); ili estas kune skribitaj kiel unu vorto, sed, en elementaj verkoj, disigitaj per streketoj (|)[1]. La gramatikaj finiĝoj estas rigardataj ankaŭ kiel memstaraj vortoj. Ekz. *vapor|ŝip|o* estas formita de: *vapor*, *ŝip* kaj *o* (finiĝo de la substantivo).

1. En leteroj kaj verkoj destinitaj por personoj jam povosciantaj la internacian lingvon, la streketoj inter la partoj de la vortoj ne estas uzataj. Ili celas ebligi al ĉiuj facile trovi en la vortaro la ĝustan sencon de ĉiu el la elementoj de la vorto kaj tiel ricevi ĝian plenan signifon, sen ia ajn antaŭa studo de la gramatiko.

**12.** Se en frazo estas alia nea vorto, la vorto *ne* estas forlasata. Ekz. *mi neniam vid|is*, *mi nenio|n vid|is*.

**13.** En frazoj respondantaj al la demando “kien”, la vortoj ricevas la finiĝon de la akuzativo. Ekz. *kie vi est|as?*, *tie* (en tiu loko); *kie|n vi ir|as?*, *tie|n* (al tiu loko), *mi ir|as Pariz|o|n*, *London|o|n*, *Varsovi|o|n*, *dom|o|n*.

**14.** Ĉiu prepozicio havas en Esperanto difinitan kaj konstantan signifon, kiu fiksas ĝian uzon; sed se ni devas uzi ian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kiun prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion *je*, kiu ne havas memstaran signifon; ekz. *ĝoj|i je tio*, *rid|i je tio*, *enu|o je la patr|uj|o*, *mal|san|a je la okul|o|j*.

La klareco neniel suferas pro tio, ĉar en ĉiuj lingvoj oni uzas en tiaj okazoj iun ajn prepozicion, se nur la uzado donis al ĝi sankcion; en la internacia lingvo ĉiam estas uzata en similaj okazoj **nur** la prepozicio *je*.

Anstataŭ la prepozicio *je* oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio, se oni timas nenian dusencaĵon.

**15.** La tiel nomataj vortoj "fremdaj", t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fremda fonto, estas uzataj en la lingvo internacia sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion kaj la gramatikajn finiĝojn de tiu ĉi lingvo. Tia estas la regulo koncerne la bazajn vortojn, sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton bazan kaj formi la ceterajn derivaĵojn el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo internacia. Ekz. *tragedi|o*, sed *tragedi|a*; *teatr|o*, sed *teatr|a* (ne: *teatrical|a*), k.t.p.

**16.** La finiĝo *o* de substantivoj kaj la *a* de la artikolo povas esti iafoje forlasataj kaj anstataŭataj de apostrofo pro belsoneco. Ekz. *Ŝiller'* (Schiller) anstataŭ *Ŝiller|o*; *de l' mond|o* anstataŭ *de la mond|o*; *dom'* anstataŭ *dom|o*.

## Gramatikaj instruoj en la *Fundamenta Ekzercaro*

- *Nomoj de la literoj: a, bo, co, ĉo, do, e, fo, go, ĝo, ho, ĥo, i, jo, ĵo, ko, lo, mo, no, o, po, ro, so, ŝo, to, u, ŭo, vo, zo.* FE.1
- *Anstataŭ "ci" oni uzas ordinare "vi".* FE.16
- *La artikolo "la" estas uzata tiam, kiam ni parolas pri personoj aŭ objektoj konataj. Ĝia uzado estas tia sama kiel en la aliaj lingvoj. La personoj, kiuj ne komprenas la uzadon de la artikolo (ekzemple rusoj aŭ poloj, kiuj ne scias alian lingvon krom sia propra), povas en la unua tempo tute ne uzi la artikolon, ĉar ĝi estas oportuna sed ne necesa. Anstataŭ "la" oni povas ankaŭ diri "l'" (sed nur post prepozicio, kiu finiĝas per vokalo).* FE.27
- *Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t. e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo. Ekzemploj: skribtablo aŭ skribotablo (= tablo, sur kiu oni skribas); internacia (= kiu estas inter diversaj nacioj); tutmonda (= de la tuta mondo); unutaga (= kiu daŭras unu tagon); unuataga (= kiu estas en la unua tago); vaporŝipo (= ŝipo, kiu sin movas per vaporo); matenmanĝi, tagmanĝi, vespermanĝi; abonpago (= pago por la abono).* FE.27
- *Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas ĉiam nur la nominativon. Se ni iam post prepozicio uzas la akuzativon, la akuzativo tie dependas ne de la prepozicio, sed de aliaj kaŭzoj. Ekzemple: por esprimi direkton, ni aldonas al la vorto la finon "n"; sekve: tie (= en tiu loko), tien (= al tiu*

*loko); tiel same ni ankaŭ diras: "la birdo flugis en la ĝardenon, sur la tablon", kaj la vortoj "ĝardenon", "tablon" staras tie ĉi en akuzativo ne ĉar la prepozicioj "en" kaj "sur" tion ĉi postulas, sed nur ĉar ni volis esprimi direkton, t. e. montri, ke la birdo sin ne trovis antaŭe en la ĝardeno aŭ sur la tablo kaj tie flugis, sed ke ĝi de alia loko flugis al la ĝardeno, al la tablo (ni volas montri, ke la ĝardeno kaj tablo ne estis la loko de la flugado, sed nur la celo de la flugado); en tiaj okazoj ni uzus la finiĝon "n" tute egale ĉu ia prepozicio starus aŭ ne. — Morgaŭ mi veturos Parizon (aŭ en Parizon).* [FE.28]

- *Se ni bezonas uzi prepozicion kaj la senco ne montras al ni, kian prepozicion uzi, tiam ni povas uzi la komunan prepozicion "je". Sed estas bone uzadi la vorton "je" kiel eble pli malofte. Anstataŭ la vorto "je" ni povas ankaŭ uzi akuzativon sen prepozicio. — Mi ridas je lia naiveco (aŭ mi ridas pro lia naiveco, aŭ: mi ridas lian naivecon). — Je la lasta fojo mi vidas lin ĉe vi (aŭ: la lastan fojon). — Mi veturis du tagojn kaj unu nokton. — Mi sopiras je mia perdita feliĉo (aŭ: mian perditan feliĉon). — El la dirita regulo sekvas, ke se ni pri ia verbo ne scias, ĉu ĝi postulas post si la akuzativon (t. e. ĉu ĝi estas aktiva) aŭ ne, ni povas ĉiam uzi la akuzativon. Ekzemple, ni povas diri "obei al la patro" kaj "obei la patron" (anstataŭ "obei je la patro"). Sed ni ne uzas la akuzativon tiam, kiam la klareco de la senco tion ĉi malpermesas; ekzemple: ni povas diri "pardoni al la malamiko" kaj "pardoni la malamikon", sed ni devas diri ĉiam "pardoni al la malamiko lian kulpon".* [FE.29]
- *Ia, ial, iam, ie, iel, ies, io, iom, iu. — La montritajn naŭ vortojn ni konsilas bone ellerni, ĉar el ili ĉiu povas jam fari al si grandan serion da aliaj pronomoj kaj adverboj. Se ni aldonas al ili la literon "k", ni ricevas vortojn demandajn aŭ rilatajn: kia, kial, kiam, kie, kiel, kies, kio, kiom, kiu. Se ni aldonas la literon "t", ni ricevas vortojn montrajn: tia, tial, tiam, tie, tiel, ties, tio, tiom, tiu. Aldonante la literon "ĉ", ni ricevas vortojn komunajn: ĉia, ĉial, ĉiam, ĉie, ĉiel, ĉies, ĉio, ĉiom, ĉiu. Aldonante la prefikson "nen", ni ricevas vortojn neajn: nenia, nenial, neniam, nenie, neniel, nenies, nenio, neniom, neniu. Aldonante al la vortoj montraj la vorton "ĉi", ni ricevas montron pli proksiman; ekzemple: tiu (pli malproksima), tiu ĉi (aŭ ĉi tiu) (pli proksima); tie (malproksime), tie ĉi aŭ ĉi tie (proksime). Aldonante al la vortoj demandaj la vorton "ajn", ni ricevas vortojn sendiferencajn: kia ajn, kial ajn, kiam ajn, kie ajn, kiel ajn, kies ajn, kio ajn, kiom ajn, kiu ajn. Ekster tio el la diritaj vortoj ni povas ankoraŭ fari aliajn vortojn, per helpo de gramatikaj finiĝoj kaj aliaj vortoj (sufiksoj); ekzemple: tiama, ĉiama, kioma, tiea, ĉi-tiea, tieulo, tiamulo k. t. p. (= kaj tiel plu).* [FE.30]
- *Glaso de vino estas glaso, en kiu antaŭe sin trovis vino, aŭ kiun oni uzas por vino; glaso da vino estas glaso plena je vino. — Alportu al mi metron da nigra drapo (Metro de drapo signifus metron, kiu kuŝis sur drapo, aŭ kiu estas uzata por drapo).* [FE.32]


- *"Da" post ia vorto montras, ke tiu ĉi vorto havas signifon de mezuro.* FE.32
- *La sufikso "um" ne havas difinitan signifon, kaj tial la (tre malmultajn) vortojn kun "um" oni devas lerni, kiel simplajn vortojn. Ekzemple: plenumi, kolumo, manumo. — Mi volonte plenumis lian deziron.* FE.42

# 41. Parencoj kaj familianoj

La sekva prezento montras per fantazia ekzemplo, kiel oni esprimas diversajn parencajn rilatojn en Esperanto. La ekzemplo ne elĉerpas la eblojn plene. Ankoraŭ pli da vortoj estas fareblaj per diversaj afiksoj kaj afiksecaj elementoj.

## La familio de Nino kaj Antono

- Supre estas pli aĝaj parencoj, malsupre pli junaj.
- La strekoj montras rilatojn inter gepatroj kaj iliaj infanoj.
- Ĉiuj virinaj nomoj ĉi tie finiĝas per *...ino*. Ĉiuj aliaj nomoj estas viraj. La nomoj estas tiel elektitaj por klareco, sed ne ekzistas regulo, ke virinaj nomoj finiĝu per *...ino* (§35.3).




Antono kaj Nino estas *geedzoj*. Li estas ŝia *edzo*, kaj ŝi estas lia *edzino*. Ili estas *geedziĝintaj*. Li estas *edziĝinta* al ŝi, kaj ŝi estas *edziniĝinta* al li.

Antono kaj Nino havas du infanojn, Ernestino kaj Vilhelmo. Antono kaj Nino estas la *gepatroj* de tiuj ĉi infanoj. Antono estas ilia *patro*, kaj Nino estas ilia *patrino*. La infanoj nomas Antonon *Paĉjo*, kaj ili nomas Ninon *Panjo*. La karesnomoj *Paĉjo* kaj *Panjo* kaj aliaj ĉi-postaj voknomoj estas faritaj per la sufiksoj ĈJ (§38.2.6) kaj NJ (§38.2.25). Vilhelmo estas *filo* de Antono kaj Nino, kaj Ernestino estas ilia *filino*. Vilhelmo kaj Ernestino estas iliaj *gefiloj*.

Antono havas *fraton*, Hugo, kaj *fratinon*, Mesalino. Antono, Hugo kaj Mesalino estas *gefratoj*. Antono nomas Hugon *Fraĉjo*, kaj li nomas Mesalinon *Franjo*. Nino havas *fratinon*, Karolino, kaj *fraton*, Teodoro. Ne ekzistas specialaj vortoj por montri, ĉu frato aŭ fratino estas pli aŭ malpli aĝa. Je bezono oni diru simple *pli aĝa fratino*, *malpli aĝa frato* k.s. Sed pli aĝa frato aŭ fratino eble povas nomi sian pli junan fraton aŭ fratinon *frateto* kaj *fratineto*.

Antono havas unu onklon, Petro (frato de lia patrino). Li nomas lin *oĉjo Petro*, aŭ simple *Oĉjo*. Antono estas *nevo* de Petro. Nino havas unu *onklon*

kaj du *onklinojn*, Ludoviko (frato de ŝia patrino), Florino (fratino de ŝia patrino), kaj Anĝelino (fratino de ŝia patro). Ŝi estas ilia *nevino*. Ili estas ŝiaj *geonkloj*. Ŝi nomas la onklinojn *onjo Florino* kaj *onjo Anĝelino*, aŭ simple *Onjo*. Nino kaj ŝiaj gefratoj, Karolino kaj Teodoro, estas *genevoj* de siaj geonkloj.

Nino havas du *avojn*, Adamo (la patro de ŝia patro) kaj Danielo (la patro de ŝia patrino). Ŝi nomas ilin *Aveto*, *Avĉjo* aŭ simile. Nino ankaŭ havas du *avinojn*, Jozefino (la patrino de ŝia patro) kaj Kolombino (la patrino de ŝia patrino). Ŝi nomas ilin *Avineto*, *Avinjo* aŭ simile. Nino estas *nepino* de Adamo, Jozefino, Danielo kaj Kolombino, kaj ili estas ŝiaj *geavoj*.

Antono estas *nepo* de Karlo kaj Esperino (la gepatroj de lia patrino). Liaj aliaj *geavoj* ne estas montritaj. Antono kaj liaj gefratoj, Hugo kaj Mesalino, estas *genepoj* de siaj geavoj.

Ernestino kaj Vilhelmo (la infanoj de Antono kaj Nino) estas *pragenepoj* (*pranepino* kaj *pranepo*), de Adamo, Jozefino, Danielo, Kolombino, Karlo kaj Esperino. Adamo estas unu el la *praavoj* de Ernestino kaj Vilhelmo, kaj Esperino estas unu el iliaj *praavinoj*.

Jakobo estas edzo de Hugo. Ili edziĝis kaj daŭre loĝas en lando, en kiu samseksaj edziĝoj (kaj ankaŭ samseksaj edziniĝoj) estas oficiale rekonataj.

Antono havas *bopatron*, Johano (la patro de lia edzino). Li ankaŭ havas *bopatrinon*, Adelino (la patrino de lia edzino). Ili estas liaj *bogepatroj*. Li estas ilia *bofilo*. Nino estas *bofilino* de Paŭlo kaj Meluzino (la gepatroj de ŝia edzo).

Antono havas du *bofratinojn*, Karolino (fratino de lia edzino) kaj Katarino (edzino de frato de lia edzino). Li ankaŭ havas tri *bofratojn*, Teodoro (frato de lia edzino), Nikodemo (edzo de lia fratino), Jakobo (edzo de lia frato). Ne ekzistas speciala vorto por la parenceco inter Johano kaj Paŭlo, aŭ inter Meluzino kaj Adelino, kvankam iliaj infanoj estas geedziĝintaj unu al la alia.

Nino estas *pranevino* de Nikolao (frato de unu el ŝiaj geavoj), kaj de Klaŭdino (fratino de alia el ŝiaj geavoj). Nikolao estas *praonklo* de Nino, kaj Klaŭdino estas *praonklino* de Nino.

Nino havas du *gekuzojn*, Felikso kaj Frino (infanoj de ŝia onklino Anĝelino). Felikso estas ŝia *kuzo*, kaj Frino estas ŝia *kuzino*. La infanoj de Nino (Ernestino kaj Vilhelmo) estas *duarangaj gekuzoj* de Georgo, la filo de Felikso, ĉar iliaj gepatroj estas *gekuzoj*. Tomaso kaj Sabino estas *bogekuzoj*, ĉar lia onklino estas edzino de ŝia onklo.

Paŭlo, la patro de Antono, estas edziĝinta dufoje. Lia dua edzino, Malvino, estas *duonpatrino* (*vicpatrino*) de Antono, Hugo kaj Mesalino, la infanoj de lia unua geedziĝo. Antono estas *duonfilo* (*vicfilo*) de Malvino, kaj Mesalino estas ŝia *duonfilino* (*vicfilino*). Roberto estas *duonfrato* de Antono, kaj Evelino estas lia *duonfratino*. Ili havas nur unu el siaj gepatroj komuna. Ankaŭ Malvino estas edziniĝinta dufoje. Ŝia dua edzo, Paŭlo, estas *duonpatro* (*vicpatro*) de Mikelo, la filo de ŝia unua geedziĝo (kun Filipo). Antono estas *duonfrato* (*vicfrato*) de Mikelo, kaj Mesalino estas *duonfratino* (*vicfratino*)

de Mikelo. Ili havas neniun el siaj gepatroj komuna. Ne ekzistas speciala esprimo por Filipo, kiu eĉ ne estas rigardata kiel familiano.

Legu pli detale pri prefikseca uzo de DUON kaj VIC en parencovortoj en §38.4.1.

## Seksa signifo de parencovortoj

La vortoj *edzo*, *patro*, *filo*, *frato*, *onklo*, *nevo*, *avo*, *nepo* kaj *kuzo* estas viraj. Por la respondaj inaj parencoj oni devas uzi la sufikson IN (§38.2.20). Se oni parolas pri ambaŭ seksoj, oni devas uzi la prefikson GE (§38.3.6).

Esperanto en sia tradicia formo ne provizas rimedon por esprimi tiujn parencorilatojn en parolado pri neduuma homo (kiu estas nek viro, nek virino, aŭ estas sekse ambigua), ĉar tradicie mankis konscio pri la ekzisto de tiaj homoj. Krome la tradicia Esperanto ne ebligas prisilenti la sekson ĉe ĉi tiaj parencorilatoj. Kelkaj opinias tion ĝena kaj tial eksperimente ekuzas novajn sekse neŭtralajn parencovortojn (§4.3).

La vortoj *parenco*, *infano* kaj *familiano* estas sekse neŭtralaj. Se oni volas aparte montri inan sekson, oni povas uzi la sufikson IN. Se oni volas aparte montri viran sekson, oni povas uzi la vorton *vira*, aŭ la radikon VIR prefiksece (§38.4.1). Oni ankaŭ povas uzi la prefikson GE, se oni volas emfazi, ke temas pri ambaŭ seksoj.

Legu pli pri la seksa signifo de radikoj kaj O-vortoj en §4.3.

# 42. Simboloj kaj mallongigoj

| | |
|---|---|
| **ekz.** | ekzemple |
| **k.a.** | kaj aliaj |
| **k.s.** | kaj simile, kaj similaj |
| **k.t.p.** | kaj tiel plu |
| **p.** | paĝo |
| **t.e.** | tio estas |
| **PMEG** | *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* |
| **PAG** | Kalocsay, Waringhien: *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto* |
| **PIV** | *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2020* (kiam temas pri antaŭa versio de tiu vortaro, ne uziĝas mallongigo, sed plena nomo, ekz. *Plena Ilustrita Vortaro kun Suplemento*) |
| **TdE** | *Tekstaro de Esperanto* |
| → | fariĝas, estas ŝanĝebla al (k.s.) |
| = | estas egala al, signifas |
| ≈ | estas proksimume egala al, signifas proksimume |
| \| | limo inter vortelementoj (en klarigoj pri elparolo = mallongega paŭzeto en la elparolo) |
| ***ápud*** | Vokalo kun dekstrakorna supersigno montras akcenton: **á**, **é**, **í**, **ó**, **ú**. En kelkaj lokoj kromakcentoj (malĉefaj akcentoj) estas montrataj per maldekstrakorna supersigno: à, è, ì, ò, ù. |
| **[...]** | Parto de frazo estas forlasita. Precipe temas pri zamenhofaj ekzemploj, kiujn necesis mallongigi. |
| ***ekzemplo°*** | La vorto aŭ vortelemento ne troviĝas en *PIV*. Por klarigo vidu la liston de ne-PIV-aj elementoj (§43). |
| ****ekzemplo**** | La ekzemplo (aŭ signifo) estas erara aŭ tre malrekomendinda. |
| ***ekzemplo*** FA2.3 | La ekzemplo estas zamenhofa el *Fabeloj de Andersen*, la dua parto, paĝo 3. Ĉiuj ekzemploj kun simila mallongigo estas zamenhofaj. Vidu la liston de literaturo (§46). |

# 43. Listo de ne-PIV-aj elementoj

En *PMEG* menciiĝas kelkaj lingvoelementoj, kiuj ne troviĝas en *PIV* (en la eldono de la jaro 2020). Tiaj elementoj havas en *PMEG* la simbolon °, ekz.: *platino°*.

Jen listo de ĉiuj tiaj ne-*PIV*-aj elementoj kun mallongaj klarigoj pri signifo kaj deveno. En kelkaj okazoj la elemento troviĝas en *PIV*, sed kun iom alia formo (ekz. OMETR) aŭ kun alia signifo (ekz. *platin|o*).

Iuj elementoj estas menciitaj nur grupe en la fino de la listo.

Ne aperas en la listo esprimoj, kiuj estas simplaj eraroj. Ankaŭ propraj nomoj de personoj ne aperas.

Notu bone, ke ne ĉiuj elementoj en la listo estas rekomendindaj. Kelkaj estas eĉ rekte malrekomendataj de *PMEG*. Ili havas steletojn, ekz.: **graŭ**.

La signo vertikalo montras limon inter radiko kaj finaĵo, ekz.: *stere|o*.

Pri la fontoj vidu la literaturliston (§46). Ĉe iuj elementoj mankas fontindiko. Tiuj elementoj ekzistas en praktika uzado, sed ne estas registritaj en vortaroj aŭ similaj verkoj.

| Elemento | Klarigo | Fonto |
|---|---|---|
| *AB* (§39.1.1) | "fiksita instalaĵo", sufikso | *Esperanta Bildvortaro* |
| *ADOR* (§39.1.6) | "ne-aŭtomata konstrumaŝino", sufikso | *Esperanta Bildvortaro* |
| *AFRO* (§39.2.1) | prefiksa mallongigo de "Afriko", prefikso | |
| *amhar\|o* (§35.4) | ano de unu el la gentoj de Etiopujo | En *PIV* kiel lingvonomo |
| *ARI* (§39.1.5) | "nombrosistemo", sufikso | *Plena Ilustrita Vortaro kun Suplemento* |
| *Aŝur\|o* (§9.1.6) | islama festotago (la deka de Muharamo°), arabe *"'Ashura"* | Cherpillod: *Nepivaj Vortoj* |
| *aŭdi\|o* (§39.2.4) | "elektronika registrado kaj reproduktado de sono" | *Wennergren*: *Roko kaj Popo* |
| AŬDIO (§39.2.4) | "teĥniko de elektronika registrado kaj reproduktado de sono", prefikso | *Esperanta Bildvortaro* |

| Elemento | Klarigo | Fonto |
|---|---|---|
| *AŬTO* (§39.2.5) | "aŭtomata", prefikso | *Plena Ilustrita Vortaro kun Suplemento* |
| *be* (§19) | mallongigo de "bemolo" | *Butler*: *Muzika Terminaro* |
| *Blis\|o* (§35.4) | la planlingvo *"Bliss"* | |
| *brekekekeks* (§18.3) | bleko de bufo | Cherpillod: *Nepivaj Vortoj*, *PIV* ĉe *kŭaks* |
| **Breksiĝ\|o** (§37.6) | la eliro de Britujo el la Eŭropa Unio, "Briteliro" | |
| *Ĉomolungm\|o* (§23.5) | la monto Everesto | *Krause*: *Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch* |
| **Daralbajd\|o** (§35.3) | "Kazablanko°" | *Poŝatlaso de la Mondo* |
| **darf\|i** (§31.7.1) | "esti permesita, rajti" | Cherpillod: *Nepivaj Vortoj* |
| *decilion\|o* (§23.2) | $10^{60}$, internacia vorto (angle *"decillion"*) | |
| *di* (§19) | mallongigo de "dieso" | Wennergren: *Roko kaj Popo* |
| **dificil\|a** (§38.3.7) | "malfacila" | *Vatré*: *Neologisma Glosaro* |
| E (§39.1.7) | "plantotribo", "koloro", sufikso | *Werner*: *Terminologia Kurso*,<br>*PIV* nur kun la senco "plantotribo" |
| *ejdz\|o* (§4.3) | "edzo aŭ edzino" (proponita sekse neŭtrala vorto) | |
| EKSBI (§39.3) | $2^{60}$, prefikso | |
| ENZ (§39.1.10) | "substanco", sufikso | *Esperanta Bildvortaro* |
| *EŬRO* (§39.2.9) | prefiksa mallongigo de "Eŭropo", prefikso | *Plena Ilustrita Vortaro kun Suplemento* |
| *Fanagal\|o* (§35.4) | piĝina interlingvo parolata en suda Afriko | |
| GIBI (§39.3) | $2^{30}$, prefikso | |

| **Elemento** | **Klarigo** | **Fonto** |
|---|---|---|
| *glu glu* (§18.3) | sono de akvo elfluanta el botelo = *kluk kluk* | *PAG* §126 |
| **graŭ** (§19) | "mal-malgraŭ, dank' al" | *PAG* §201 kaj §257 (en piednotoj) |
| IĈ (§39.1.13) | "virseksa", sufikso | *Günkel*: *GuVo* |
| *IF* (§39.1.14) | "igi io", sufikso | *PAG* §414 |
| IP (§39.1.18) | "neduuma (nek viro, nek virino)", sufikso | |
| *Interglos\|o* (§35.4) | la planlingvo *"Interglossa"* | |
| *Interlingva\|o* (§35.4) | la planlingvo *"Interlingua"* | |
| *Interlingve\|o* (§35.4) | la planlingvo *"Interlingue"* | |
| *ISTAN* (§39.1.19) | "lando", sufikso | *Aktoj de la Akademio III* |
| **iŝi** (§19) | ina versio de la pronomo "ili", "tiuj virinoj" (proponita ina pronomo triapersona multe-nombra) | |
| J (§39.1.23) | sekse neŭtrala karesnoma sufikso | |
| JOBI (§39.3) | $2^{80}$, prefikso | |
| **kaŭ** (§16.2) | "kaj/aŭ" | |
| *Kazablank\|o* (§35.3) | havenurbo en Maroko | *Poŝatlaso de la Mondo* |
| KIBI (§39.3) | $2^{10}$, prefikso | |
| *kluk kluk* (§18.3) | sono de akvo elfluanta el botelo = *glu glu* | *PAG* §126 |
| **kodumaton\|o** (§37.6) | koduma maratono, "kod(um)festo" | |
| **kompufon\|o** (§37.6) | telefono, kiu esence estas komputilo, = saĝtelefono, lerta telefono | |
| KVETA (§39.3) | $10^{30}$, prefikso | |

| Elemento | Klarigo | Fonto |
|---|---|---|
| KVEKTO (§39.3) | $10^{-30}$, prefikso | |
| *Lingvafranka\|o* (§35.4) | iama piĝina interlingvo ĉe Mediteraneo | |
| *Loglan\|o* (§35.4) | la planlingvo *"Loglan"*, *"la logla"* | |
| *Loĵban\|o* (§35.4) | la planlingvo *"Lojban"* | |
| MEBI (§39.3) | $2^{20}$, prefikso | |
| *Meka\|o* (§2.2) | "Mekko" | |
| **mon\|o** (§39.2.18) | evitinda mallongigo de "monofonio°" | |
| *mono\|o* (§39.2.18) | mallongigo de "monofonio°" | Wennergren: *Roko kaj Popo* |
| *monofoni\|o* (§39.2.18) | "unukanala sonreproduktado" | *Esperanta Bildvortaro* |
| *Muharam\|o* (§9.1.6) | la unua monato de la islama jaro (arabe *"al-Muharram"*) | |
| **na** (§19) | rolvorteto por rekta objekto | *Makkink*: *Nia Fundamento sub lupeo*, *Cherpillod*: *Leksikaj Vagadoj* |
| **nen** (§19) | "ne" (respondvorto) | *Plena Ilustrita Vortaro kun Suplemento* |
| *nonilion\|o* (§23.2) | $10^{54}$, internacia vorto (angle *"nonillion"*) | |
| *Nova-Skoti\|o* (§1.2) | provinco en Kanado | *Aktoj de la Akademio III* |
| *Novial\|o* (§35.4) | la planlingvo *"Novial"* | |
| *OFON* (§39.1.25) | "lingvano, lingvaneco", sufikso | *Günkel*: *GuVo* |
| OJD (§39.1.26) | "similformaĵo", variento de la sufikso OID | *Wells*: *Concise Esperanto and English Dictionary* |
| *Okcidental\|o* (§35.4) | la planlingvo *"Occidental"* | |

| Elemento | Klarigo | Fonto |
|---|---|---|
| *o kej* (§18.4) | "bone!" | *Wells*: *English - Esperanto - English dictionary* |
| *oktilion\|o* (§23.2) | $10^{48}$, internacia vorto (angle *"octillion"*) | |
| OMETR (§39.1.30) | "mezurilo", sufikso | En *PIV* kiel METR |
| OMETRI (§39.1.31) | "scienca mezurado", sufikso | En *PIV* kiel METRI |
| *orom\|o* (§35.4) | ano de la plej multnombra gento de Etiopujo | |
| *OTEK* (§39.1.32) | "kolekto, kolektejo, kolektujo", sufikso | En *PIV* kiel TEK |
| *pajtr\|o* (§4.3) | "patro aŭ patrino" (proponita sekse neŭtrala vorto) | |
| *parent\|o* (§4.3) | "patro aŭ patrino" (proponita sekse neŭtrala vorto) | |
| PEBI (§39.3) | $2^{50}$, prefikso | |
| *Picburg\|o* (§2.1) | urbo en Pensilvanio, Usono | |
| PJ (§39.1.23) | karesnoma sufikso por neduumaj homoj | |
| *platin\|o* (§38.2.20) | "plateno" (speco de metalo) | Dr Esperanto: *Meždunarodnyj Jazyk* ["La Unua Libro"], Zamenhof: *la Fundamenta Krestomatio* p. 233 (en *PIV* estas alia vorto *platin\|o* kun tute alia signifo) |
| *Pocdam\|o* (§2.1) | la ĉefurbo de la federacia lando Brandenburgo en Germanujo | Cherpillod: *Nepivaj Vortoj* (ĉe **Potsdamo**) |
| **pseŭd\|a** (§39.2.21) | "malvera, kaŝita, ŝajna, iluzia" | *PAG* §422 ĉe la prefikso PSEŬDO |

| Elemento | Klarigo | Fonto |
|---|---|---|
| *ri* (§11.5) | "li aŭ ŝi", "tiu persono" (proponita sekse neŭtrala pronomo triapersona unu-nombra homa) | |
| RONA (§39.3) | $10^{27}$, prefikso | |
| RONTO (§39.3) | $10^{-27}$, prefikso | |
| **Sanhelen\|o** (§39.2.23) | "Sankta Heleno" (brita insulo en Atlantiko) | *Poŝatlaso de la Mondo* |
| **Sanpier\|o** (§39.2.23) | "Sankta Petro" (franca insulo en Atlantiko) | *Poŝatlaso de la Mondo* |
| *sekstet\|o* (§39.1.35) | "muzikaĵo por sesopo da muzikistoj" | *Krause*: *Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch* |
| *sekstilion\|o* (§23.2) | $10^{36}$, internacia vorto (angle *"sextillion"*) | |
| *Senthelen\|o* (§39.2.23) | "Sankta Heleno" (brita insulo en Atlantiko) | |
| *Sentpier\|o* (§39.2.23) | "Sankta Petro" (franca insulo en Atlantiko) | |
| *septilion\|o* (§23.2) | $10^{42}$, internacia vorto (angle *"septillion"*) | |
| *sis* (§23.1.1) | "ses" | |
| *Solresol\|o* (§35.4) | la planlingvo *"Solresol"* | |
| *somal\|o* (§35.4) | ano de la ĉefgento de Somalujo, ano de Somalujo | *Wells*: *English - Esperanto - English dictionary*, *Listo de Rekomendataj Landnomoj*. En *PIV* kiel monunuo. |
| *spoz\|o* (§4.3) | "edzo aŭ edzino" (proponita sekse neŭtrala vorto) | |
| *stere\|o* (§39.2.18) | "stereofonio, dukanala sonreproduktado" | Wennergren: *Roko kaj Popo* |
| STIF (§38.4.1) | parenceco kreita per re-geedziĝo, prefikso | *PAG* §425 (rimarko I) |

<table>
<tr><th>Elemento</th><th>Klarigo</th><th>Fonto</th></tr>
<tr><td>svazi|o (§35.4)</td><td>ano de la ĉefgento de Svazilando, ano de Svazilando</td><td>Wells: English - Esperanto - English dictionary, Listo de Rekomendataj Landnomoj</td></tr>
<tr><td>TEBI (§39.3)</td><td>$2^{40}$, prefikso</td><td></td></tr>
<tr><td>tigraj|o (§35.4)</td><td>ano de unu el la gentoj de Etiopujo</td><td></td></tr>
<tr><td>tik tak (§18.3)</td><td>sono de meĥanika horloĝo</td><td>PAG §126</td></tr>
<tr><td>tofu|o (§2.1)</td><td>speco de sojkazeo (en PIV “toŭfuo”)</td><td>Wells: English - Esperanto - English dictionary</td></tr>
<tr><td>Tokipon|o (§35.4)</td><td>la planlingvo “toki pona”</td><td></td></tr>
<tr><td>Tokpisin|o (§35.4)</td><td>kreola lingvo parolata en Papuo-Nov-Gvineo</td><td></td></tr>
<tr><td>*UK* (§39.1.36)</td><td>“kastrita besto”, sufikso</td><td>PAG §372 (rimarko II)</td></tr>
<tr><td>Vakajam|o (§2.1)</td><td>urbo en Japanujo</td><td>Poŝatlaso de la Mondo</td></tr>
<tr><td>*Varŝav|o* (§35.3)</td><td>“Varsovio”</td><td>Ŝulco: Leksara kolekto de ofte uzataj propraj nomoj</td></tr>
<tr><td>VIDEO (§39.2.29)</td><td>“teĥniko de elektronika registrado kaj reproduktado de moviĝantaj bildoj”, prefikso</td><td>Plena Ilustrita Vortaro kun Suplemento, en PIV kun la formo VIDE</td></tr>
<tr><td>Vinĉestr|o (§2.1)</td><td>urbo en Anglujo</td><td>En PIV kiel speco de memordisko</td></tr>
<tr><td>vu|o (§1.2)</td><td>“duobla vo, vavo”, nomo de la litero W</td><td>Pokrovskij: Komputada leksikono</td></tr>
<tr><td>ZEBI (§39.3)</td><td>$2^{70}$, prefikso</td><td></td></tr>
</table>

## Grekaj literoj

Aperas nomoj de grekaj literoj (§19). El la plene esperantigitaj nur *delt|o*, *epsilon|o*, *jot|o*, *lambd|o* kaj *omeg|o* troviĝas en *PIV* (por la aliaj *PIV* donas nur duone esperantigitajn formojn sen O-finaĵo). La literomoj *alf|o*, *bet|o* kaj *gam|o* troviĝas en *Wüster*, *Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana*. La nomo *rot|o* troviĝas en Pokrovskij, *Komputada leksikono*. La aliaj estas de Wennergren: *alf|o*, *bet|o*, *gam|o*, *zet|o*, *et|o*, *tet|o*, *kap|o*, *mu|o*, *nu|o*, *ksi|o*, *omikron|o*, *pi|o*, *rot|o*, *sigm|o*, *taŭ|o*, *upsilon|o*, *fi|o*, *ĥi|o*, *psi|o*. El la duone esperantigitaj nomoj tri estas de Wennergren: *epsilon*, *omikron* kaj *upsilon*. La aliaj estas en *PIV*.

## Hebreaj literoj

Aperas duone esperantigitaj nomoj de hebreaj literoj (§19): *alef*, *bet*, *gimel*, *dalet*, *he*, *vav*, *zain*, *ĥet*, *tet*, *jod*, *kaf*, *lamed*, *mem*, *nun*, *sameĥ*, *ain*, *pe*, *cadi*, *kof*, *reŝ*, *ŝin*, *tav*. Ili estas el la *Psalmaro* de *La Sankta Biblio* (sed ili verŝajne ne estas zamenhofaj).

## Tononomoj

Aperas specialaj nomoj por bemolaj kaj diesaj tonoj (§19): **As*, **Ais*, **Bes*, **Bis*, **Ces*, **Cis*, **Des*, **Dis*, **Es*, **Eis*, **Fes*, **Fis*, **Ges*, **Gis*. Ili troviĝas en *Wüster*, *Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana* kaj en Desmet', *Bildvortaro*.

## Nombrovortoj

Menciiĝas kelkaj maloftegaj nombrovortoj (§23.2): *undecilion|o*, *duodecilion|o*, *tredecilion|o*, *kvatuordecilion|o*, *kvindecilion|o*, *seksdecilion|o*, *septendecilion|o*, *oktodecilion|o*, *novemdecilion|o*, *vigintilion|o*, *centilion|o*. Ili estas de *Wennergren*.

## Tabelvortoj

Menciiĝas neoficialaj kaj nepre evitendaj tabelvortoj je ALI (§13.3). Nur du el ili, **aliel* kaj **alies* estas registritaj en *PIV*. Kvin el la aliaj, **aliam*, **alie*, **alio*, **aliu* kaj (nerekte) **alia*, estas menciitaj en *PAG* §62 kaj §88 (rimarko I). En Cherpillod: *Nepivaj Vortoj* aperas **alial* kaj **aliom*.

## Ekkriaj vortetoj, sonimitoj

Aperas kelkaj alternativaj skriboj de ekkriaj vortetoj kaj sonimitoj (§18.4). Ili estas de Wennergren: *hu ra*, *ho la*, *a ha*, *e he*, *o ho*, *mjaŭ*.

## 44. Gramatika vortareto

*PMEG* uzas netradiciajn gramatikajn esprimojn. La sekva listo enhavas mallongajn klarigojn de ili. Iuj gramatikaj esprimoj de *PMEG* estas tamen tiel memklarigaj, ke ne estas necese ilin listigi ĉi tie. La tradiciaj vortoj, kiuj menciiĝas en la klarigoj, estas laŭ *PAG*. Rimarku, ke la *PMEG*-aj esprimoj ne ĉiam estas precize samsignifaj kiel la respondaj vortoj de *PAG*. Se vin interesas, kial *PMEG* uzas netradiciajn gramatikajn terminojn, legu la aldonon "Pri la gramatikaj terminoj en *PMEG*" (§45).

| | |
|---|---|
| **afikso (§38.1)** | Radiko, kiu estas uzata precipe por fari kunmetitajn vortojn. Afiksoj, kiujn oni metas post aliaj radikoj, nomiĝas **sufiksoj** (= postafiksoj). Afiksoj, kiujn oni metas antaŭ aliaj radikoj, nomiĝas **prefiksoj** (= antaŭafiksoj). |
| **aktivo (§3.2)** | La ordinara speco de frazo, en kiu la subjekto estas tiu, kiu faras la agon de la ĉefverbo. Vidu ankaŭ **pasivo**. |
| **alvoko (§12.1.2)** | Frazrolo, kiu montras tiun, al kiu la eldiro estas direktata. Tradicie nomata "vokativo". |
| **apudmeto (§25.3)** | Frazparto, kiu ordinare staras tuj post alia frazparto, kaj kiu montras la saman aferon per aliaj vortoj. Tradicie nomata "apozicio". |
| **A-vorta frazparto (§7.2)** | Frazparto, en kiu la ĉefvorto estas A-vorto. |
| **A-vorteca vorteto, A-eca vorteto (§15)** | Vorteto, kiu povas roli simile kiel A-vorto, kvankam ĝi ne havas A-finaĵon, ekz. *tiu*, *iu*, *ĉia*, *kies*, *ĉies*, *ambaŭ*. Tradicie nomata "pronomo". |
| **A-vorto (§5)** | Vorto kun la finaĵo A. Tradicie nomata "adjektivo". |
| **ĉeffrazo (§3.2)** | Ordinara memstara frazo. Tradicie nomata "ĉefpropozicio". Vidu ankaŭ **subfrazo**. |
| **ĉefverbo (§3.2)** | Verbo kun iu el la finaĵoj AS, IS, OS, U, US. Tradicie nomata "predikato" aŭ "finitivo". |
| **ĉefvorto (§3.3)** | La plej grava vorto en frazparto. Aliaj partoj de frazparto estas rektaj priskriboj de la ĉefvorto. Tradicie nomata "kerno-vorto". |
| **difinilo (§9)** | Vorteto, kiun oni metas antaŭ O-vorta frazparto por difini la identecon de la afero. La plej grava difinilo estas la difina artikolo la (§9.1). |
| **diftongo (§2.1)** | Vokala sono, en kiu la lango moviĝas de unu pozicio en la buŝo al alia. |
| **duonvokalo (§2.1)** | Sono, kiu laŭ la elparola maniero estas (mallonga) vokalo, sed kiu rolas en la lingvo kiel konsonanto. |

| | |
|---|---|
| **ekkria vorteto (§18)** | Vorteto, kiu esprimas senton, ekz. *ho*, *he*, *ha*, *lo*, *stop*, *baf*. Tradicie nomata “interjekcio”. |
| **eksafikso (§37.6)** | Vidu ĉe **ŝajnafikso**. |
| **E-vorteca vorteto, E-eca vorteto (§14)** | Vorteto, kiu povas roli simile kiel E-vorto en frazo, kvankam ĝi ne havas E-finaĵon, ekz. *tiam*, *kiel*, *iom*, *nenie*, *tre*, *ankoraŭ*, *hodiaŭ*, *ĉi*, *for*. Tradicie nomata “primitiva adverbo”. |
| **E-vorta frazparto (§7.3)** | Frazparto, en kiu la ĉefvorto estas E-vorto. |
| **E-vorto (§6)** | Vorto kun la finaĵo E. Tradicie nomata “adverbo”, sed la vorto adverbo inkluzivas ankaŭ multajn vortetojn, kiuj ne havas E-finaĵon. Tiaj vortetoj nomiĝas en *PMEG* **E-vortecaj vortetoj**. |
| **finaĵo (§3.1)** | Lingva elemento, kiun oni metas post radiko, kunmetaĵo aŭ vorteto, por fari vorton, aŭ por ŝanĝi la signifon de vorto. O, A, E, I, AS, IS, OS, US kaj U estas **vortklasaj finaĵoj**. J estas **multe-nombra finaĵo**. N estas **rolfinaĵo**. |
| **frazenkondukilo (§33.1)** | Vorteto, kiu enkondukas subfrazon ligante ĝin al ĝia ĉeffrazo, ekz. *ke*, *ĉar*, *dum*, *kiam*, *kvankam*. Tradicie nomata “subjunkcio”. |
| **frazeto (§37.4)** | Malpreciza esprimo por grupo de vortoj, kiuj iel kunapartenas. Uzata ĉefe kiam temas pri vortfarado. Vidu ĉe **frazetvorto**. Tradicia esprimo por “frazeto” ne ekzistas. |
| **frazetvorto (§37.4)** | Speco de kunmetita vorto farita el frazeto (vortgrupo), kiun oni vortigis per aldono de ia posta elemento (ekz. vortklasa finaĵo). Vidu ankaŭ **kombino**. Tradicia esprimo por “frazetvorto” ne ekzistas. |
| **frazo (§3.2)** | Kompleta eldiro kun ĉefverbo kaj ordinare ankaŭ kun aliaj frazpartoj. Tradicie nomata “propozicio”. |
| **frazparto (§3.2)** | Vorto aŭ vortgrupo, kiu ludas unu frazrolon. Vidu ĉe **ĉefvorto** kaj **priskribo**. |
| **frazrolo (§3.2)** | Rolo, kiun frazparto rolas en frazo. Tradicie nomata “frazelemento”. |
| **imaga modo (§26.4)** | US-formo de verbo. Ĝi montras, ke la ago aŭ stato ne estas reala, sed nur imagata, fantazia. Ankaŭ nomata **US-modo** aŭ **US-verbo**. Tradicie nomata “kondicionalo”. |

| | |
|---|---|
| **kombino (§37.3)** | Speco de kunmetita vorto, en kiu la lasta parto (krom la vortklasa finaĵo), montras la bazan signifon. Tiu lasta parto nomiĝas ĉefelemento. Tio, kio staras antaŭ la ĉefelemento, precizigas la signifon, kaj nomiĝas preciziga antaŭelemento. Vidu ankaŭ **frazetvorto**. Tradicia esprimo por "kombino" ne ekzistas. |
| **komplemento (§3.2)** | Frazparto, kiu diras, en kiu maniero, en kiu loko, en kiu tempo, per kiu ilo k.t.p., okazas la ĉefverbo. Ĉiu frazparto krom ĉefverbo, subjekto, objekto kaj perverba priskribo, estas komplemento. Tradicie nomata "adjekto". |
| **konsonanto (§2.1)** | Ĉiu litero aŭ sono en Esperanto krom A, E, I, O kaj U, kiuj estas **vokaloj**. |
| **kunliga vorteto (§16)** | Vorteto, kiu kunligas samrolajn vortojn, frazpartojn aŭ frazojn, ekz. *kaj*, *aŭ*, *sed*. Tradicie nomata "konjunkcio". |
| **modo (§26)** | Maniero, en kiu ago aŭ stato estas prezentata. Ĉe la Esperantaj verboj oni faras distingon inter kvar modoj: **neŭtrala modo**, **reala modo**, **vola modo** kaj **imaga modo**. |
| **multe-nombro (§8)** | Pli ol unu afero. Tradicie nomata "pluralo". La finaĵo J montras multe-nombron, kaj nomiĝas **multe-nombra finaĵo**. Tradicie nomata "plurala finaĵo". Vidu ankaŭ **unu-nombro**. |
| **nerekta objekto (§12.2.2)** | Vidu ĉe **objekto**. |
| **nerekta parolo (§33.8)** | Rerakontado de ies penso, diro, opinio, decido, demando, rimarko k.s., per subfrazo. Vidu ankaŭ **rekta parolo**. |
| **neŭtrala modo (§26.1)** | I-formo de verbo. Ĝi nomas agon aŭ staton sen montri, ĉu ĝi estas reala, imagata, fantazia aŭ volata, kaj sen montri tempon. Ankaŭ nomata **I-modo** aŭ **I-verbo**. Tradicie nomata "infinitivo". |
| **nombrovorto (§23)** | Vorto, kiu montras nombron. Se ĝi estas senfinaĵa vorteto, ĝi nomiĝas **nombra vorteto**. Tradicie nomata "numeralo". Nombrovorto, kiu havas A-finaĵon, kaj kiu montras vicordon, nomiĝas **vicorda nombrovorto**. Tradicie nomata "orda numeralo". |
| **objekta verbo (§30.3)** | Verbo, kiu povas havi objekton. Tradicie nomata "transitiva verbo". Vidu ankaŭ **senobjekta verbo**. |

**objekto (§12.2.2)**
Frazrolo, kiu montras tion, kio estas rekte trafata de la ago de la ĉefverbo. Iafoje oni parolas pri “rekta objekto” (= objekto) kontraste al “nerekta objekto”. “Nerekta objekto” nomiĝas en *PMEG al*-komplemento. Ordinara (rekta) objekto estas tradicie nomata ankaŭ “akuzativa objekto”. Nerekta objekto estas tradicie nomata ankaŭ “dativa objekto”.

**O-vorta frazparto (§7.1)**
Frazparto, en kiu la ĉefvorto estas O-vorto.

**O-vorteca vorteto, O-eca vorteto (§15)**
Vorteto, kiu povas roli simile kiel O-vorto, kvankam ĝi ne havas O-finaĵon, ekz. *tio*, *tiu*, *mi*, *ili*, *ambaŭ*. Tradicie nomata “pronomo”.

**O-vorto (§4)**
Vorto kun la finaĵo O. Tradicie nomata “substantivo”.

**participo (§28)**
Vorto kun unu el la sufiksoj ANT, INT, ONT, AT, IT kaj OT.

**pasivo (§29)**
Speco de “inversa” frazokonstruo, en kiu tio, kio ordinare (en aktivo) estas objekto, aperas kiel subjekto. Vidu ankaŭ **aktivo**.

**persona pronomo (§11.1)**
Vidu ĉe **pronomo**.

**perverba priskribo (§25.1)**
Vidu ĉe **priskribo**.

**poseda pronomo (§11.2)**
Vidu ĉe **pronomo**.

**prefikso (§38.1)**
Vidu ĉe **afikso**.

**priskribo (§3.3)**
**Rekta priskribo** priskribas la ĉefvorton de frazparto, kaj estas mem parto de tiu frazparto. Tradicia gramatiko uzas la vortojn “epiteto” kaj “suplemento”. **Perverba priskribo** estas memstara frazparto, kiu priskribas la subjekton aŭ la objekton pere de verbo. Tradicie nomata “predikativo”.

**pronomeca vorteto (§15)**
Vorteto, kiu same kiel persona pronomo anstataŭas tutan O-vortan frazparton, ekz. *ambaŭ*, *tiu*, *nenio*. Tradicie nomata “pronomo”.

| | |
|---|---|
| **pronomo (§11)** | Iu el la O-vortecaj vortetoj: *mi*, *vi*, *li*, *ŝi*, *ĝi*, *ni*, *ili*, *oni* kaj *si* (kaj *ci*). La baza formo de pronomo nomiĝas pli precize **persona pronomo**. Tradicie oni parolas pri "personpronomo" aŭ "personalo". Se oni aldonas A-finaĵon al pronomo, ĝi fariĝas **poseda pronomo**: *mia*, *via*, *lia*, *ŝia*, *ĝia*, *nia*, *ilia*, *onia* kaj *sia* (kaj *cia*). Tradicie oni parolas ankaŭ pri "posedpronomo" aŭ "posesivo". Tradicie la vorto "pronomo" inkluzivas ankaŭ multajn aliajn vortetojn, kiuj en *PMEG* nomiĝas **pronomecaj vortetoj**, **O-vortecaj vortetoj** kaj **A-vortecaj vortetoj**. |
| **radiko (§3.1)** | Lingva elemento, kiu bezonas finaĵon por fariĝi vorto. Vidu ankaŭ **vorteto**. |
| **reala modo (§26.2)** | AS-formo, IS-formo aŭ OS-formo de verbo. La reala modo montras, ke la ago aŭ stato estas reala, ne nur imagata aŭ volata. Tradicie nomata "indikativo". |
| **rekta objekto (§12.2.2)** | Vidu ĉe **objekto**. |
| **rekta parolo (§33.8)** | Rerakontado de ies penso, diro, opinio, decido, demando, rimarko k.s., per (pli-malpli) laŭvorta citaĵo. Vidu ankaŭ **nerekta parolo**. |
| **rekta priskribo (§3.3)** | Vidu ĉe **priskribo**. |
| **rilata KI-vorto (§33.4)** | KI-vorto, kiu enkondukas rilatan (nedemandan) subfrazon. Tradicie iuj el ili nomiĝas "rilativo", "rilativa pronomo" aŭ "rilatpronomo". |
| **rilata subfrazo (§33.4)** | Subfrazo, kiun enkondukas rilata (nedemanda) KI-vorto. Tradicie iuj el ili estas nomataj "rilativa subpropozicio". |
| **rolfinaĵo (§12)** | La finaĵo N. Tradicie nomata "akuzativo". Vidu ankaŭ **rolmontrilo**. |
| **rolmontrilo (§12)** | Vorteto aŭ finaĵo, kiu montras la rolon de frazparto en la frazo. Mankas tradicia esprimo. Tia vorteto nomiĝas **rolvorteto**. La finaĵo N estas **rolfinaĵo**. |
| **rolvortaĵo (§12.3.7)** | E-vorto kaj rolmontrilo, kiuj rolas kune kvazaŭ unu rolmontrilo, ekz. *dekstre de*, *konforme al*, *kompare kun*, *koncerne* ...N. Tradicie nomata "prepoziciaĵo". |
| **rolvorteto (§12.3)** | Vorteto, kiu montras la frazrolon de la posta frazparto. Tradicie nomata "prepozicio", ekz. *sur*, *en*, *ekster*, *per*, *pro*, *je*, *krom*, *tra*, *anstataŭ*. Vidu ankaŭ **rolmontrilo**. |

| | |
|---|---|
| **senobjekta verbo (§30.2)** | Verbo, kiu ne povas havi objekton. Tradicie nomata "netransitiva verbo". Vidu ankaŭ **objekta verbo**. |
| **sensubjekta verbo (§30.1)** | Verbo, kiu ne bezonas subjekton. Tradicia esprimo por "sensubjekta verbo" ne ekzistas. Vidu ankaŭ **subjekta verbo**. |
| **subfrazo (§33)** | Frazo, kiu rolas kiel frazparto de alia frazo. Tradicie nomata "subpropozicio". Vidu ankaŭ **ĉeffrazo**. |
| **subjekta verbo (§30.2)** | Verbo, kiu devas havi subjekton. Tradicia esprimo por "subjekta verbo" ne ekzistas. Vidu ankaŭ **sensubjekta verbo**. |
| **subjekto (§12.1.1)** | Frazrolo, kiu (en aktiva frazo) montras tion, kio faras la agon de la ĉefverbo. |
| **sufikso (§38.1)** | Vidu ĉe **afikso**. |
| **ŝajnafikso (§37.6)** | Radikparto, kiu ŝajnas esti afikso, kvankam ĝi tute ne estas. Se temas pri io, kio estis vera afikso en la origina lingvo, oni parolas pri **eksafikso**. Tradicie eksafikso nomiĝas "pseŭdoafikso". |
| **tabelvorto (§13)** | Iu el tiuj 45 vortetoj, kiuj komenciĝas per *ki-*, *ti-*, *i-*, *ĉi-* aŭ *neni-*. Tradicie nomata ankaŭ "korelativa vorto". |
| **unu-nombro (§8)** | Unu afero. Tradicie nomata "singularo". Vidu ankaŭ **multe-nombro**. |
| **verbo (§26)** | Vorto kun iu el la finaĵoj I, AS, IS, OS, U kaj US. Vidu ankaŭ **ĉefverbo**. |
| **vicorda nombrovorto (§23.4)** | Vidu ĉe **nombrovorto**. |
| **vokalo (§2.1)** | Iu el la literoj aŭ sonoj A, E, I, O kaj U. Ĉiuj aliaj literoj kaj sonoj en Esperanto estas **konsonantoj**. Vidu ankaŭ **duonvokalo**. |
| **vola modo (§26.3)** | U-formo de verbo. Ĝi montras, ke la ago aŭ stato ne estas reala, sed nur volata. Ankaŭ nomata **U-modo** aŭ **U-verbo**. Tradicie nomata "volitivo" aŭ "imperativo". |
| **vorteto (§3.1)** | Lingva elemento, kiu povas roli kiel vorto sen bezono de finaĵo. *PAG* parolas pri "solstariva lingvo-elemento". Vidu ankaŭ **radiko**. |
| **vortklasa finaĵo (§3.1)** | Vidu ĉe **finaĵo**. |

## Tradiciaj gramatikaj vortoj

Jen listo de tradiciaj gramatikaj vortoj kun la plej proksimaj *PMEG*-aj esprimoj. La tradiciaj vortoj estas pli-malpli laŭ la sistemo de *PAG*. Rimarku, ke al unu *PAG*-a vorto povas respondi pli ol unu *PMEG*-a esprimo, kaj inverse. La liston oni do uzu tre singarde. Tio, kio estas egala en *PAG* kaj en *PMEG*, ne enestas en la listo. Mankas en la listo ankaŭ multaj *PAG*-aj vortoj, por kiuj *PMEG* ne uzas ian specialan gramatikan esprimon. Rimarku, ke aliaj gramatikistoj uzas aliajn sistemojn, kiuj plej ofte estas sufiĉe similaj al tiu de *PAG*, sed kiuj povas diferenci en detaloj.

**ablativa adjekto** → *de*-komplemento, *el*-komplemento

**adjektiva radiko** → eca radiko

**adjektivo** → A-vorto

**adjekto** → komplemento

**adverbo** → E-vorto, E-vorteca vorteto

**afrikato** → ekfrota konsonanto

**agento** → aganto (en pasiva frazo)

**akuzativa objekto** → objekto

**akuzativo** → N-finaĵo

**apozicio** → apudmeto

**bilabialo** → lipa konsonanto

**ĉefpropozicio** → ĉeffrazo

**dativa objekto**, **dativo** → *al*-komplemento

**dentalo** → denta konsonanto

**epiteto** → rekta priskribo

**finitivo** → ĉefverbo

**frikativo** → frota konsonanto

**futuro** → venonta tempo

**gerundio** → participo kun E-finaĵo

**gingivalo** → gingiva konsonanto

**imperativo** → vola modo, U-modo, U-verbo

**indikativo** → reala modo

**infinitivo** → neŭtrala modo, I-modo, I-verbo

**interjekcio** → ekkria vorteto

**interogativo** → demanda vorteto

**kerno-vorto** → ĉefvorto

**kondicionalo** → imaga modo, US-modo, US-verbo

**konjunkcio** → kunliga vorteto

**korelativa vorto** → tabelvorto

**labialo** → lipa konsonanto

**laringalo** → glota konsonanto

**likvido** → duonbara konsonanto

**nazalo** → naza konsonanto

**negacio** → neado, nea vorto

**netransitiva verbo** → senobjekta verbo

**nominativa** → sen rolmontrilo

**numeralo** → nombra vorteto

**objekta predikativo** → perverba priskribo de objekto

**orda numeralo** → vicorda nombrovorto

**personalo**, **personpronomo** → pronomo, persona pronomo

**plozivo** → eksploda konsonanto

**pluralo** → multe-nombro

**posedpronomo** → poseda pronomo

**predikativo** → perverba priskribo

**predikato** → ĉefverbo

**prepoziciaĵo** → rolvortaĵo

**prepozicio** → rolvorteto

**prepozitivo** → frazparto kun rolvorteto

**preterito** → pasinta tempo

**prezenco** → nun-tempo

**primitiva adverbo** → E-vorteca vorteto

**pronomo** → (persona) pronomo, pronomeca vorteto, O-vorteca vorteto, A-vorteca vorteto

**prononco** → elparolo

**propozicio** → frazo

**pseŭdoafikso** → eksafikso

**radikokaraktero** → propra signifo de radiko

**refleksiva pronomo** → *si*, *sia*

**rilativo** → rilata KI-vorto

**singularo** → unu-nombro

**solstariva lingvoelemento** → vort-eto

**subjekta predikativo** → perverba priskribo de subjekto

**subjunkcio** → frazenkondukilo

**subpropozicio** → subfrazo

**substantiva radiko** → radiko nek aga, nek eca

**substantivo** → O-vorto

**suplemento** → rekta priskribo

**tenso** → tempo

**transitiva verbo** → objekta verbo

**velaro** → vela konsonanto

**verba radiko** → aga radiko

**vokativo** → alvoko

**volitivo** → vola modo, U-modo, U-verbo.

## 45. Pri la gramatikaj terminoj en *PMEG*

Kiam mi ekverkis tiun ĉi gramatikon, la precipa ideo estis, ke *PMEG* estu pli facile alirebla ol la *Plena Analiza Gramatiko*, kiun multaj trovas tre malfacila. Mi volis klarigi la gramatikon en kiom eble simpla maniero, tiel ke ne nur lingvistoj kaj gramatikistoj komprenu, sed ankaŭ ordinaraj lernantoj. Sed mi tamen volis verki profundan kaj kiom eble kompletan gramatikon.

Mi konstatis, ke tradiciaj gramatikaj terminoj kiel *prepozicio*, *propozicio*, *adjektivo*, *adjekto*, *adverbo* k.t.p. ofte estas misuzataj de nespecialistoj. La kompreno de tiaj gramatikaj fakvortoj tre varias. En iuj landoj oni zorge instruas pri gramatiko uzante gramatikajn fakesprimojn, sed en aliaj landoj oni faras tion multe malpli. Nuntempe en iuj landoj oni preskaŭ tute forlasis instruadon de gramatiko, kaj kiam temas pri la gepatra lingvo, kaj kiam temas pri fremdaj lingvoj. Laŭ miaj spertoj multaj imagas, ke ili scias, kion tiaj terminoj signifas, kaj ili eĉ mem volonte uzas ilin. Sed tre ofte ili uzas la terminojn erare. Mi vidis instruilojn Esperantajn, en kiuj oni parolis pri adjektivoj, sed nomis ilin *adjektoj*. Mi aŭdis homojn paroli pri *prepozicioj*, kvankam ili vere celis subjunkciojn aŭ eĉ adverbojn. Mi aŭdis homojn babili pri *adverboj*, kiam ili celis komplementojn. Kaj tiel plu.

La klasika gramatika terminologio ne estas nur malbone komprenata, ĝi estas ankaŭ mankohava per si mem. Ĝi baziĝas esence sur la gramatika sistemo de Latino, kaj tial ĝi sufiĉe bone taŭgas por klarigi ĝuste tiun lingvon. Sed aliaj lingvoj havas aliajn strukturojn kaj aliajn gramatikajn kategoriojn. La strukturo de Esperanto havas gravan bazan distingon inter *vortetoj* kaj *radikoj*. Vortetoj povas uziĝi tiaj, kiaj ili estas en frazoj, dum radikoj bezonas vortklasajn finaĵojn por fariĝi efektivaj vortoj. Tiu distingo ne estas facile priskribebla per klasikaj gramatikaj esprimoj. *PAG* parolas pri *elementoj solstarivaj* kaj *elementoj kompletigendaj aŭ finaĵbezonaj* (§277). Sed pro tio, ke tiu distingo estas nekonata aŭ neesenca en klasika gramatiko, kaj eble ankaŭ pro tio, ke la elektitaj terminoj estas plurvortaj buŝplenaĵoj, la distingon oni ne aparte emfazas en *PAG*. Ĝi fakte aperas unue en la ĉapitro pri vortfarado fine de la libro. En la pli frua baza ĉapitro pri *Vortospecoj kaj vortofunkcioj PAG* ignoras tiun distingon, kvankam ĝi estas tute baza en nia lingvo. Laŭ mi necesas prezenti tiun fundamentan distingon frue en klarigado de la Esperanta gramatiko. Sed por fari tion oni bezonas facile uzeblajn terminojn. La terminojn, kiujn mi elektis, *vortetoj* kaj *radikoj*, oni devas lerni, ĉar iliaj signifoj estas konvenciaj. Sed la esprimoj mem estas bone uzeblaj kaj facile memoreblaj.

Unu ofta kritiko kontraŭ Esperanto estas, ke ni asertas, ke en Esperanto ĉiuj adverboj finiĝas per la finaĵo E. Lernantoj baldaŭ konstatas, ke tio ne estas prava, ĉar ekzistas primitivaj adverboj, kiuj tute ne havas vortklasan finaĵon: *pli*, *hodiaŭ*, *tre* k.a. Malpli multaj rimarkis, ke esence statas same pri adjektivoj. Ni havas adjektivojn kun A-finaĵo (*ruĝa*, *granda*, *saĝa*...), kaj ni havas primitivajn adjektivojn kiel *tiu*, *ambaŭ*, *ties* k.a. Sed kial oni do kritikas nur la primitivajn adverbojn? La klarigo estas, ke klasike oni ordinare ne nomas la nacilingvajn respondaĵojn al niaj primitivaj adjektivoj per la termino *adjektivo*, dum oni ja nomas la nacilingvajn respondaĵojn al niaj primitivaj adverboj per la vorto *adverbo*. Statas tute simile pri la substantivoj: Apud substantivoj kun O-finaĵo (*tablo*, *homo*, *kuro*...) ni havas substantivecajn vortojn sen O-finaĵo: *mi*, *iu*, *ambaŭ*, *ĉio* k.a. Sed tiujn substantivecajn vortojn oni tute ne nomas *substantivoj*.

> **Noto:** Tamen en kelkaj landoj oni kutimas uzi la terminon *adjektivo* por iuj primitivaj adjektivoj. Tiel estas en anglalingva gramatika tradicio, kie oni nomas ekz. la vorton *that* per la termino *demonstrative adjective* (montra adjektivo).

Laŭ mia opinio la supozata neregulaĵo de la Esperantaj adverboj estas iluzio kaŭzita de tio, ke oni insistas uzi klasikajn terminojn pri Esperanto ankaŭ kiam ili ne vere trafas. Se oni uzas klarigojn, kiuj baziĝas sur la distingo inter vortetoj kaj radikvortoj, la supozata neregulaĵo forvaporiĝas. La sistemo de vortklasaj finaĵoj koncernas nur la radikvortojn, kaj sekve la manko de E-finaĵo ĉe iuj adverboj ne vere estas neregulaĵo (aŭ simila "neregulaĵo" ekzistas ankaŭ ĉe niaj substantivoj kaj niaj adjektivoj).

Kiam mi ekverkis *PMEG*-on, estis al mi dekomence klare, ke mi volas instrui kaj klarigi la lingvon Esperanto kaj ties strukturon. Mi ne volis instrui ĝeneralan lingvosciencon, nek la gramatikon de Latino. Mi ankaŭ ne volis instrui gramatikajn terminojn. Tiajn mi tamen bezonis uzi, sed la terminaro estu rimedo en la instruado, ne instrucelo. Tial mi elektis uzi tiajn evidentajn terminojn kiel *O-vorto* (= substantivo), *A-vorto* (= adjektivo) kaj *E-vorto* (= adverbo). Oni atentu, ke la egaleco-signoj estas iom simpligaj. Al miaj A-vortoj ne apartenas la primitivaj adjektivoj, kaj al miaj E-vortoj ne apartenas la primitivaj adverboj. Tiujn vortetojn mi anstataŭe decidis nomi *A-vortecaj vortetoj* kaj *E-vortecaj vortetoj* respektive. Eble tiuj terminoj estas iom longaj, sed ili almenaŭ klare esprimas tion, kion mi celis. Ili fakte montriĝas nelernendaj, ĉar ili estas pli-malpli memklarigaj. Kaj tio estas grava avantaĝo: Nur parto de mia novspeca terminaro estas vere lernenda. Multaj el miaj esprimoj kompreniĝas per si mem.

Aliflanke estas malavantaĝo de miaj pure Esperantaj terminoj, ke ili ne bone taŭgas, se oni volas priskribi aliajn lingvojn. Ne estas tre sencohave paroli pri *O-vortoj*, kiam temas ekz. pri anglaj aŭ japanaj substantivoj, ĉar tiuj tute ne havas O-finaĵon. Oni do ĝuste komprenu mian celon: Mi ne volis forigi la klasikajn terminojn. Mi nur volis uzi pli facilajn kaj pli laŭcelajn esprimojn en klarigado de Esperanto. Parolante pri aliaj lingvoj oni uzu aliajn terminojn, taŭgajn por la respektivaj lingvoj.

Post la gravaj vortospecoj O-vortoj, A-vortoj kaj E-vortoj sekvas la eĉ pli grava vortospeco *verboj*. Sed kiel do nomi tiun vortospecon en facila terminologio? Dum la O-vortoj, A-vortoj kaj E-vortoj havas po unu karak-

terizan finaĵon, per kiu eblas ilin nomi, verboj havas jen I, jen AS, jen IS k.t.p. Tradicie oni rigardas la I-formojn de verboj kiel bazajn, sed la termino *I-vorto* ne estus oportuna kiel anstataŭaĵo de *verbo*. Unue ĝi estus miskomprenebla tiel, ke ĝi celas nur verbojn kun I-finaĵo, kaj due la I-formo de verbo estas la malplej verbeca el ĉiuj verbaj formoj. Ĝi estas multrilate pli substantiveca ol verbeca. Krome *I-vorto* estas pli longa ol *verbo*, eĉ se nur je unu silabo.

Oni konsciu, ke anstataŭigado de la klasikaj terminoj ne estis celo por mi. Ĝi estis rimedo por faciligi la instruadon de la gramatiko. La klasika termino *verbo* estas ne nur plaĉe mallonga. Ĝi estas ankaŭ unu el tiuj klasikaj gramatikvortoj, kiujn homoj ĝenerale sufiĉe ĝuste komprenas. Dum multaj apenaŭ aŭ nur nebule scias, kio estas ekz. adjekto aŭ suplemento, ili ofte sufiĉe bone scias, kio estas verbo. Do, la vorton *verbo* mi simple povis reteni. Per tio malfermiĝis la eblo uzi *I-verbo* anstataŭ *infinitivo* kaj *AS-verbo* anstataŭ *prezenco* k.t.p.

Mi renkontis pli ol unu fojon la miskomprenon, ke mi aparte celis anstataŭigi ĉiujn klasikajn terminojn. Iuj vere miris, ke kelkajn terminojn klasikajn mi lasis en *PMEG*. Kelkaj eĉ rigardis tion kiel iaspecan malsukceson de mia flanko. Sed kompleta anstataŭigado neniam estis mia celo.

Alia tereno, kie la klasika terminologio malhelpas prezenti klare la strukturon de Esperanto, estas la tereno de *frazroloj* kaj ties markado. Klasika terminologio konas *kazojn*, *prepoziciojn* kaj *postpoziciojn*. Tute strange ĝi uzas du malsamajn terminojn por prepozicioj kaj postpozicioj, kvankam temas esence pri unu sama vortklaso. Oni ne nomas adjektivojn antaŭ-starajn kaj post-starajn per malsamaj terminoj, ekz. **prejektivoj** kaj **postjektivoj**. Iuj lingvoj havas nur "prejektivojn" (ekz. la sveda) dum aliaj havas nur "postjektivojn" (ekz. la persa), kaj ankoraŭ aliaj lingvoj havas ambaŭ (ekz. la franca). Sed la pozicio de adjektivo ne estas esencaĵo. Ĉu adjektivo estas antaŭ-stara, ĉu post-stara, temas pri la sama vortklaso, kaj tial oni logike uzas unu saman terminon. En moderna lingvoscienco ekzistas la termino *adpozicio*, kiu kovras kaj prepoziciojn kaj postpoziciojn. Ĝin oni tamen tre malmulte uzas. Sed ankaŭ tiu termino estas misgvida. Ĉiuj tri terminoj *prepozicio*, *postpozicio* kaj *adpozicio* nomas la koncernatan vortkategorion surbaze de la ideo "pozicio". En Esperanto tio estas nur etimologie vera, sed tamen efikas misgvide. Ĝene ofte mi spertis, ke oni erare imagas, ke ekz. *ankaŭ* estas prepozicio, ĉar ĝi kutime staras en pozicio antaŭ tio, al kio ĝi rilatas.

Bona terminologio nomu tiun vortklason, kiu inkluzivas prepoziciojn kaj postpoziciojn, per termino, kiu baziĝas sur esenca trajto de tiaj vortoj. La lingva tasko de tiaj vortoj estas montrado de frazroloj. Tiun funkcion ili tamen dividas kun la kazoj. Prepozicioj, postpozicioj kaj kazoj esence plenumas la saman taskon. Indas do nomi ilin en simila maniero. La klasika terminologio tamen donas nenian rimedon por tio.

En *PMEG* mi elektis paroli ĝenerale pri *rolmontriloj*. Tiu kategorio enhavas la *rolfinaĵon* N (la solan kazan finaĵon en Esperanto) kaj ĉiujn *rolvortetojn* (prepoziciojn). Rolfinaĵo estas finaĵo, kiu montras frazrolojn, kaj rolvortetoj

estas vortetoj, kiuj montras frazrolojn. La parenceco inter la finaĵo N kaj la rolvortetoj estas en Esperanto aparte frapa: Oni povas uzi jen N, jen *al* por la sama rolo: *Mi helpis li**n** = Mi helpis **al** li*; *Ni vojaĝis **al** Parizo = Ni vojaĝis Parizo**n***. Eblas uzi jen N, jen *je* por la sama signifo: *Ĝi estas alta **je** cent metroj = Ĝi estas alta cent metroj**n***. Tial estas tre inde prezenti tiujn lingvoelementojn kiel parencajn en la terminologio. Sed por fari tion novaj gramatikaj esprimoj estas bezonataj.

Mi neniel imagas, ke mi perfekte sukcesis en mia novspeca terminologio. Kelkaj esprimoj, kiujn mi uzas en *PMEG*, estas sufiĉe longaj. Eble mi povus elpensi pli mallongajn. Kaj certe eblas elpensi pli trafajn aŭ pli klarajn aŭ alimaniere pli bonajn terminojn. Sed mi almenaŭ provis.

Ĉu miaj faciligiloj eble estas malfaciligiloj por tiuj, kiuj jam scias la klasikan terminologion? Ili ja bezonas lerni novajn esprimojn por kompreni *PMEG*-on. Mi tamen pritaksas, ke ilia peno estas relative malgranda, kaj ke ĝin vaste kompensas la malpeno, kiun spertas tiuj, kiuj neniam bone lernis la klasikajn terminojn. Kaj eble tiuj, kiuj kapablas kompreni la klasikajn fakvortojn, tamen pro la nova prezentomaniero en *PMEG* iafoje povas vidi iajn aferojn en nova lumo dank' al miaj terminoj.

Detala prezento de la *PMEG*-aj gramatikaj terminoj troviĝas en la ĉi-antaŭa gramatika vortareto (§44).

Al tiuj, kiuj preferas tradiciajn gramatikajn terminojn, mi povas rekomendi la verkon *Detala Gramatiko de Esperanto*, kiu esence estas mallongigita *PMEG* kun tradiciaj terminoj. Antaŭa versio estas legebla ankaŭ en la Interreto ĉe <*https://lernu.net/gramatiko*>.

Bertilo *Wennergren*

## 46. Literaturo

*Akademiaj Studoj 1983*. Redaktis *Rüdiger Eichholz*. *Esperanto press*. *Bailieboro* [Kanado], 1983.

*Akademiaj Studoj 1984*. Redaktis *Rüdiger Eichholz*. *Esperanto press*. *Bailieboro* [Kanado], 1984.

*Akademiaj Studoj 1985*. Redaktis *Rüdiger Eichholz*. *Esperanto press*. *Bailieboro* [Kanado], 1985.

*Akademiaj Studoj 1987*. Redaktis *Rüdiger Eichholz*. *Esperanto press*. *Bailieboro* [Kanado], 1988.

*Akademiaj Studoj 1988-1990*. Redaktis *Rüdiger Eichholz*. *Esperanto press*. *Bailieboro* [Kanado], 1990.

*Aktoj de la Akademio 1963-1967. (Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, 9)*. 2a eldono, *Rotterdam* [Nederlando], 2007. *<https://akademio-de-esperanto.org/aktoj/aktoj1/>*. [Enhavas interalie enketojn kaj decidojn pri la pasivaj participoj kaj pri la vortfarado.]

*Aktoj de la Akademio II 1968-1974. (Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, 10)*. 2a eldono, *Rotterdam* [Nederlando], 2007. *<https://akademio-de-esperanto.org/aktoj/aktoj2/>*. [Enhavas interalie la Okan Oficialan Aldonon al la Universala Vortaro, kaj la Bazan Radikaron Oficialan.]

*Aktoj de la Akademio III 1975-1991. (Oficiala Bulteno de la Akademio de Esperanto, 11)*. Redaktis *André Albault* (k.a.). *Paris* [Francujo], 1992. [Enhavas interalie la Liston de Normaj Landnomoj.]

*Albault, André*: *Naŭ Prelegoj pri la Fundamento*. Iltis-Eldonejo, *Saarbrücken* [Germanujo], 1990.

*Butler, Montagu C[hristie]*: *Esperanto-English Dictionary*. Brita Esperanto-Asocio, *London* [Britujo], 1967.

*Butler, M[ontagu] C[hristie]*; *Merrick, F.*: *Muzika Terminaro*. Kun alfabeta indekso de *David G. Hill*. Muzika Esperanto-Ligo, *Sofia* [Bulgarujo], 1992 (represo).

*Cherpillod, André*: *Leksikaj Vagadoj*. *La Blanchetière*, *Courgenard* [Francujo], 2012.

*Cherpillod, André*: *Lingvaj Babilaĵoj*. *La Blanchetière*, *Courgenard* [Francujo], 2005.

*Cherpillod, André*: *Nepivaj Vortoj*. La aŭtoro, *Courgenard* [Francujo], 1988.

*Cherpillod, André*: *Vortkonsisto, vortfarado, vortanalizo, vortordo*. Memeldono, *Courgenard* [Francujo], 1996.

*De Hoog, H[endrik] A[rie]*: *Du Malsanoj en Esperanto. Kia-ismo. Tiom-Kiom-ismo*. *Hällabrottet* [Svedujo], 1954.

*De Hoog, H[endrik] A[rie]*: *La senpera verbigo de adjektivoj*. *Artur E. Iltis*, *Saarbrücken* [Germanujo], 1978. Represo de la eldono “*Den Haag* 1955”.

*Deka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro.*. *<https://akademio-de-esperanto.org/decidoj/10oa.html>*.

Desmet', Petro; *Horvath*, Jozefo: *Bildvortaro*. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno [Belgujo], 2012.

Dr Esperanto [Zamenhof L. L.]: *Meždunarodnyj Jazyk. Predislovie i polnyj učebnik. Por Rusoj* ["La Unua Libro"]. *Kel'ter*, *Varšava* [Rusujo], 1887. Represo en *Ludovikologia dokumentaro I. Unuaj libroj. (Eble neniam kompletigotaj necesaj aldonoj al la pvz, kolekto 1)*. Eldonejo ludovikito, sen loko, 1991.

*Dua Oficiala Aldono al Universala Vortaro. (Esperantista Dokumentaro, Kajero trideka)*. Raportis *Th[éophile] Cart*. Esperantista Centra Oficejo, *Paris* [Francujo], 1919.

*Esperanta Bildvortaro*. Tradukita el la germana de *Rüdiger Eichholz*. *Esperanto Press*, *Bailieboro* [Kanado], 1988.

*Esperantic Studies Foundation*: *Tekstaro de Esperanto*. Elektronika lingvoscienca tekstaro (korpuso) de Esperanto. Administras Bertilo *Wennergren*.

*Fructicier, Paul*: *Kompleta Gramatiko kaj Vortfarado de Esperanto*. Reviziita kaj kompletigita de *S. Grenkamp-Kornfeld*. Esperantista Voĉo, *Jaslo* [Pollando], 1930.

*Günkel, Claus. J.*: *GuVo. Gunkela Vortaro*. Provizora 2a eldono, *Paderborn* [Germanujo], Aprilo 1994.

*International Organization for Standardization*: *International Standard ISO 8601-1:2019 Date and time — Representations for information interchange Part 1: Basic rules*. *Geneva* [Svislando], 2019. <*https://www.iso.org/standard/40874.html*>. [Internacia normo por skribado de datoj kaj horoj.]

*Kalocsay, K[álmán]*: *Lingvo Stilo Formo. Studoj*. 3a eldono, Pirato, *Oosaka* [Japanujo], 1970.

*Kalocsay, K[álmán]*; *Waringhien, G[aston]*; *Bernard, R[oger]*: *Parnasa Gvidlibro*. 3a eldono, Edistudio, *Pisa*, Italujo; Heroldo de Esperanto, *Madrid* [Hispanujo], 1984.

*Kalocsay, K[álmán]*; *Waringhien, G[aston]*: *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*. 4a eldono, Universala Esperanto-Asocio, *Rotterdam* [Nederlando], 1980.

*Kalocsay, K[álmán]*: *Vojaĝo inter la Tempoj*. Stafeto, *La Laguna* [Hispanujo], 1966.

*Kramer*, *Markos*; *Cerante, Luko*: *J-riismo: riismo sen problemaj signifoŝovoj*. Egalecen (blogo), 2018. <https://egalecen.wordpress.com/2018/02/20/j-riismo/2018/02/20/j-riismo/>. [*Ri*° kaj novaj sekse neŭtralaj radikoj.]

*Krause, Erich-Dieter*: *Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch*. *Helmut Buske Verlag*, *Hamburg* [Germanujo], 1999.

*La Esperantisto. Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto. 1889-1895*. Kun postparolo de *Reinhard Haupenthal*. *Georg Olms Verlag*, *Hildesheim* [Germanujo], *Zürich* [Svislando], *New York* [Usono], 1988.

*La Zamenhofa Esperanto. Simpozio pri -ata/-ita*. Eldonis kaj redaktis *J[uan] Régulo [Pérez]*. Stafeto, *La Laguna* [Hispanujo], 1961.

*Listo de Rekomendataj Landnomoj*. Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 12, 2009 05 04. *<https://akademio-de-esperanto.org/decidoj/landnomoj/listo_de_rekomendataj_landnomoj/>*.

*Makkink, G[errit] F[rançois]*: *Nia Fundamento sub lupeo*. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno [Belgujo], 1990.

*Moirand, Daniel*: *Materialoj pri la nuna uzado de la akuzativo*. Flandra Esperanto-Ligo, *Antwerpen* [Belgujo], 1990.

*Naŭa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro*. Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 8, 2007 03 10. *<https://akademio-de-esperanto.org/oficialaj_informoj/oficialaj_informoj_8_2007.html>*.

*Neves, Gonçalo*; *Pabst, Bernhard*: *Historia Vortaro de Esperanto*. Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto, Volumo 12. Monda Asembleo Socia (MAS), *Embres-et-Castelmaure* [Francujo], 2018, *<https://www.eventoj.hu/steb/vortaroj/Historia-Vortaro-2018.pdf>*.

*Nomura, Rihej*: *Zamenhofa Ekzemplaro*. Nagoja Esperanto-Centro, *Nagoya* [Japanujo], 1989.

*Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto, n-ro 19, 2012 07 03. <https://akademio-de-esperanto.org/oficialaj_informoj/oficialaj_informoj_19_2012.html>*. [Enhavas respondon al demando pri perverba priskribo de objekto, kiu estas I-verbo aŭ subfrazo.]

PAG. Vidu ĉi-antaŭe ĉe *Kalocsay, K[álmán]*; *Waringhien, G[aston]*: *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*.

*Piron, Claude*: *La Bona Lingvo*. Pro Esperanto, Vieno [Aŭstrujo]; Hungara Esperanto-Asocio, *Budapest* [Hungarujo], 1989.

PIV. Vidu ĉi-poste ĉe *Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2020*.

*Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto kun Suplemento*. Redaktoris *Gaston Waringhien*. 4a eldono, Sennacieca Asocio Tutmonda, *Paris* [Francujo], 1987.

*Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto 2020*. Gvidis *Michel Duc Goninaz*. Sennacieca Asocio Tutmonda, *Paris* [Francujo], 2020. [Vidu ankaŭ *<https://vortaro.net>*.]

*Pokrovskij*, Sergio: *Komputada leksikono*. Redakcio 28a, *Novosibirsk* [Rusujo], Januaro 2006, *<https://bertilow.com/div/komputada_leksikono/KOVRILO.html>*.

*Poŝatlaso de la Mondo*. Redaktoris *Ludmila Jiroušková*. *Kartografie*, *Praha* [Ĉeĥujo], 1971.

*Rusoj loĝas en Rusujo*. Redaktis *Anna Löwenstein*. *Federazione Esperantista Italiana*, *Milano* [Italujo], 2007.

*Saussure, René de*: *La Vort-Teorio en Esperanto*. *Artur E. Iltis*, *Saarbrücken* [Germanujo], 1982. Represo de la eldono "*Genève* 1914".

*Setälä, Vilho*; *Vilborg, Ebbe*; *Støp-Bowitz, C[arl]*: *Esperanto – Moderna Lingvo*. Fondumo Esperanto, *Helsinki* [Finnlando], 1965.

Ŝulco, Rikardo [*Schultz, Richard*]; Bermano, Hermano [*Behrmann, Hermann*]: *Leksara kolekto de ofte uzataj propraj nomoj*. Esperanto-Centro, *Paderborn* [Germanujo], 1989.

*Unua Libro*. Vidu ĉi-antaŭe ĉe Dr Esperanto, *Meždunarodnyj Jazyk*.

*Unua Oficiala Aldono al Universala Vortaro. (Esperantista Dokumentaro, Kajero dek-tria)*. Raportis *Th[éophile] Cart*. Esperantista Centra Oficejo, *Paris* [Francujo], 1909.

*Vatré, Henri*: *Neologisma Glosaro. Eta postrikolto al PIV*. 3a eldono, Iltis-Eldonejo, *Saarbrücken*, Germanujo, 1989.

Velger, Helmuto [*Welger, Helmut*]: *Kontribuoj al la Norma Esperantologio. Enkonduko. Ekspertizetoj. Kritikoj*. *Info-servo r.a.*, *Marburg/Lahn* [Germanujo], Oktobro 1999.

*Vilborg, Ebbe*: *Etimologia Vortaro de Esperanto*. Volumoj 1 – 5. Eldona Societo Esperanto, *Malmö* [Svedujo], 1989, 1991, 1993, 1995 (vol. 1 – 4), *Stockholm* [Svedujo], 2001 (vol. 5).

*Vleminck, Christiane de*; *van Damme, Émile*: *Grammaire ABC d'espéranto*. Flandra Esperanto-Ligo, *Antwerpen* [Belgujo], 1990.

*Waringhien, Gaston*: *Lingvo kaj Vivo. Esperantologiaj Eseoj*. Dua reviziita eldono kun Apendico. Universala Esperanto-Asocio, *Rotterdam* [Nederlando], 1989.

*Waringhien, Gaston*: *1887 kaj la sekvo. Eseoj IV*. Stafeto, Antverpeno [Belgujo]; *La Laguna* [Hispanujo], 1980.

*Wells, J[ohn] C[hristopher]*: *Concise Esperanto and English Dictionary*. *Hodder and Stoughton Ltd*, *Dunton Green*, *Sevenoaks* [Britujo], 1969.

*Wells, John C[hristopher]*: *English - Esperanto - English dictionary. A comprehensive and yet concise two-way dictionary designed for beginners and more advanced students of Esperanto alike, and also incorporating a summary of Esperanto grammar*. *Mondial*, *New York* [Usono], 2010. [Reviziita dua eldono de *Concise Esperanto and English Dictionary*.]

*Wells, John C[hristopher]*: *Lingvistikaj Aspektoj de Esperanto*. Universala Esperanto-Asocio, *Rotterdam* [Nederlando], 1978.

*Wennergren, Bertil*: *Bertil Wennergrens Nya Esperantokompendium*. Eldona Societo Esperanto, *Malmö* [Svedujo], 1990.

*Wennergren*, Bertilo: *Detala Gramatiko de Esperanto*. Tria plibonigita eldono bazita sur *PMEG* 2023, Eldonejo Espero por E@I, *Martin* [Slovakujo], 2012. [Vidu ankaŭ la interretan version de la dua eldono ĉe *<https://lernu.net/gramatiko>*.]

*Wennergren, Bertilo*: *Roko kaj Popo, Popularmuzika Terminaro en Esperanto*. Revizio 1.2, 1999: *<https://bertilow.com/roko/>*.

*Werner, Jan*: *Terminologia Kurso*. *Sdružený klub ROH*, *Roudnice nad Labem* [Ĉeĥujo], 1986 *<https://denizo.opia.dk/la.trezorejo/tekstoj/libroj.pdf/fakaj.libroj.pdf/scienco/Terminologia_kurso.pdf>*.

*Wüster, Eugen*: *Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana*. 1a – 4a partoj (“A” – “korno”). *Ferdinand Hirt & Sohn*, *Leipzig* [Germanujo], 1923.

Zamenhof, L.: *Fundamenta Krestomatio de la Lingvo Esperanto*. 18a eldono, Universala Esperanto-Asocio, *Rotterdam* [Nederlando], 1992.

Zamenhof, L. L.: *Fundamento de Esperanto*. 9a eldono kun enkondukoj, notoj kaj lingvaj rimarkoj de *A[ndré] Albault*. Esperantaj Francaj Eldonejoj, *Marmande* [Francujo], 1963. [Vidu ankaŭ <*https://akademio-de-esperanto.org/fundamento/*>.]

Zamenhof, L. L.: *Lingvaj Respondoj. Konsiloj kaj Opinioj pri Esperanto*. Editoris *G[aston] Waringhien*. Sepa eldono, iam kompletigota plena verkaro de l.l. zamenhof, kromkajero 8, Eldonejo ludovikito, sen loko, 1990.

## Fontoj de zamenhofaj ekzemploj

La zamenhofaj ekzemplofrazoj estas redonitaj en kiom eble senŝanĝa formo. Mallongigoj estas faritaj nur kiam necese, kaj tio ĉiam estas montrita per la signoj “[...]”. Klarigaj aldonoj aperas inter rektaj krampoj: “[aldona teksto]”. Iafoje la uzo de fina punkto aŭ demandosigno devis pro mallongigo de la ekzemplo esti ŝanĝita. Tio ne estas montrita. Iafoje ankaŭ malgravaj ŝanĝoj rilate al frazkomencaj majuskloj estas faritaj senkomente.

Iafoje grasa skribo, substrekoj aŭ ia speciala litertipo troviĝis en la origina teksto. Ĉio tia estas forprenita, ĉar en *PMEG* grasaj literoj kaj substrekoj estas uzataj por elstarigi gravajn partojn de la ekzemploj.

La ekzemploj ne venas rekte el zamenhofaj manuskriptoj, sed el presitaj eldonoj, kaj diversaj redaktoroj kaj kompostistoj staras inter ni kaj Zamenhof. Tial multaj malgravaj detaletoj, kiel ekz. uzo de majuskloj, ne estas ĉiam vere zamenhofaj. Iafoje redaktoroj faris eĉ sufiĉe gravajn ŝanĝojn. En *PMEG* aperas ĉiam tiu formo, kiun la ekzemplo havas en la presita eldono (krom evidentaj malgravaj preseraroj, kiuj estas korektitaj senkomente).

Ekzemploj kun ia tre dubinda (eĉ erara) formo, kiu povus konfuzi lernantojn, estis ĝenerale evitataj.

En tre fruaj tekstoj estis uzataj tabelvortoj je AN, kiuj poste estis ŝanĝitaj al AM. Tiaj malnovaj formoj estas ĉiam ŝanĝitaj en la novajn, krom en unu ekzemplo (§14.2.1).

Ĉe ĉiu zamenhofa ekzemplo ĝia fonto (originala verko de Zamenhof aŭ traduko fare de li) estas montrita per postmetita mallongigo jene:

*ekzemplo* [FA2.3] = ekzemplo el *Fabeloj de Andersen*, dua parto, paĝo 3

Numero post tia mallongigo estas **paĝonumero**. Esceptoj estas FE (la *Ekzercaro*), kie ĝi estas **numero de ekzerco**, PE (*Proverbaro Esperanta*), kie ĝi estas **numero de proverbo**, la bibliaj libroj, kie ĝi estas **numero de ĉapitro** kaj LR (Lingvaj Respondoj de Zamenhof) kie ĝi estas **numero de respondo**.

La mallongigo **TdE** ĉi-poste montras, ke la koncerna fonto estas legebla kaj priserĉebla en la Tekstaro de Esperanto: <*https://tekstaro.com*>.

La jenaj fonto-mallongigoj estas uzataj en *PMEG*:


**AD** Dro Esperanto [Zamenhof L. L.]: *Aldono al la "Dua Libro de l' Lingvo Internacia". Ĥ. Kelter*, Varsovio [Rusujo], 1888. Represo en *Unua etapo de Esperanto 1878-1895. (iom reviziita plena verkaro de l.l. zamenhof, originalaro I)*. Eldonejo ludovikito, sen loko, 1989. TdE

**BV** *Dickens, Charles*: *La batalo de l' vivo*. Tradukis el Germana traduko L. L. Zamenhof. Aperis en la gazeto *La Esperantisto*, 1891, numeroj 2–7 (Februaro–Julio) kaj 9–11 (Septembro–Novembro). La paĝonumeroj estas tiuj de la gazeto. TdE

**DL** Dro Esperanto [Zamenhof L. L.]: *Dua Libro de l' lingvo Internacia. Kajero Nº 1. Ĥ. Kelter*, Varsovio [Rusujo], 1888. Represo en *Unua etapo de Esperanto 1878-1895. (iom reviziita plena verkaro de l.l. zamenhof, originalaro I)*. Eldonejo ludovikito, sen loko, 1989. TdE

**FA1** *Andersen, H[ans] C[hristian]*: *Fabeloj. Unua Volumo*. Tradukis [el germana traduko] D-ro L. L. Zamenhof. Dua eldono, Heroldo de Esperanto, Bruselo [Belgujo], 1965. Represo en *fabeloj de andersen. koboldoimuna eldono. (iam kompletigota plena verkaro de l.l. zamenhof, volumo 7)*. Eldonejo ludovikito, sen loko, 1990. TdE

**FA2** *Andersen, H[ans] C[hristian]*: *Fabeloj. Plena Kolekto. Dua Parto*. Tradukis [el germana traduko] Dro L. L. Zamenhof. Esperantista Centra Librejo, *Paris* [Francujo], 1926. Represo en *fabeloj de andersen. koboldoimuna eldono. (iam kompletigota plena verkaro de l.l. zamenhof, volumo 7)*. Eldonejo ludovikito, sen loko, 1990. TdE

**FA3** *Andersen, H[ans] C[hristian]*: *Fabeloj. Plena Kolekto. Tria Parto*. Tradukis [el germana] traduko Dro L. L. Zamenhof. Esperantista Centra Librejo, *Paris* [Francujo], 1932. Represo en *fabeloj de andersen. koboldoimuna eldono. (iam kompletigota plena verkaro de l.l. zamenhof, volumo 7)*. Eldonejo ludovikito, sen loko, 1990. TdE

**FA4** *Andersen, H[ans] C[hristian]*: *Fabeloj. Kvara Volumo*. Tradukis [el germana traduko] L. L. Zamenhof. Unua eldono, Heroldo de Esperanto, Bruselo [Belgujo], 1963. Represo en *fabeloj de andersen. koboldoimuna eldono. (iam kompletigota plena verkaro de l.l. zamenhof, volumo 7)*. Eldonejo ludovikito, sen loko, 1990. TdE

**FAnt** La *Antaŭparolo* en Zamenhof, *Fundamento de Esperanto* TdE

**FE** La *Ekzercaro* en Zamenhof, *Fundamento de Esperanto* TdE

**FG** La *Fundamenta Gramatiko* en Zamenhof, *Fundamento de Esperanto*

**FK** Zamenhof: *Fundamenta Krestomatio de la Lingvo Esperanto*. Aperas en *PMEG* nur ekzemploj el Krestomatiaj tekstoj, kiuj estas certe zamenhofaj. Vidu p. 446 en la Krestomatio. TdE

**Gm** *Ŝalom Alejĥem*: *La Gimnazio*. Tradukis L. L. Zamenhof. 1a eldono, Esperantista Centra Librejo, *Paris* [Francujo], 1924. [Eldonita en unu volumo kune kun Rn.] TdE

**H** *Shakespeare, W[illiam]*: *Hamleto. Reĝido de Danujo*. Tradukis L. L. Zamenhof. *Librairie Hachette et C*ie, *Paris* [Francujo], 1902. TdE

**IT** *Goethe, [Johann Wolfgang von]*: *Ifigenio en Taŭrido. Dramo en kvin aktoj*. Tradukis L. L. Zamenhof. 3a eldono, Esperantista Centra Librejo, *Paris* [Francujo], 1929. TdE

**L1** *Leteroj de L.-L. Zamenhof. I. 1901-1906*. Prezentis kaj komentis *G[aston] Waringhien*. Sennacieca Asocio Tutmonda, *Paris* [Francujo], 1948.

**L2** *Leteroj de L.-L. Zamenhof. II. 1907-1914*. Prezentis kaj komentis *G[aston] Waringhien*. Sennacieca Asocio Tutmonda, *Paris* [Francujo], 1948.

**LR** Zamenhof: *Lingvaj Respondoj* TdE

**M** *Orzeszko, Eliza*: *Marta*. Tradukis L. L. Zamenhof. 4a eldono, *Editions françaises d'espéranto*, *Marmande* [Francujo], 1968. TdE

**OV** Zamenhof, L. L.: *Originala Verkaro*. Kolektis kaj ordigis *Joh[annes] Dietterle*. *Ferdinand Hirt & Sohn*, *Leipzig* [Germanujo], 1929. TdE [Rimarku, ke la teksto en la *Tekstaro de Esperanto* iafoje estas iom alia ol en la presita eldono, ĉar la Tekstara versio estas trakontrolita laŭ la originaj tekstoj, precipe en la gazeto *La Esperantisto*. La PMEG-ekzemploj el OV ĉiam sekvas la korektitan tekston en la *Tekstaro de Esperanto*.]

**PE** Zamenhof, M. F.: *Proverbaro Esperanta. Laŭ la verko Frazeologio rusa-pola-franca-germana*. Tradukis kaj aranĝis L. L. Zamenhof. *Librairie Hachette et C*ie, *Paris* [Francujo], 1910. [Rimarku, ke en iuj postaj eldonoj de la *Proverbaro Esperanta* la numeroj de la proverboj estas tute aliaj ol en tiu ĉi origina eldono.] TdE

**Rn** *Heine, Henri* [*Heinrich*]: *La Rabeno de Baĥaraĥ*. Tradukis L. L. Zamenhof. 1a eldono, Esperantista Centra Librejo, *Paris* [Francujo], 1924. [Eldonita en unu volumo kune kun Gm.] TdE

**Rt** *Schiller*, Frederiko [*Friedrich*]: *La Rabistoj*. Tradukis L. L. Zamenhof. 2a eldono, Esperantista Centra Librejo, *Paris* [Francujo], 1928. TdE

**Rz** *Gogol, N[ikolaj] V[asilievič]*: *La Revizoro*. Tradukis L. L. Zamenhof. 2a eldono, Esperantista Centra Librejo, *Paris* [Francujo], 1928. TdE

**UL** Dr Esperanto: *Meždunarodnyj Jazyk* [“La Unua Libro”]. La paĝonumeroj celas la rusan version de la Unua Libro en la ĉi-antaŭe menciita represo en *Ludovikologia dokumentaro I. Unuaj libroj*. TdE

## Bibliaj ekzemploj

*La Sankta Biblio, Malnova kaj Nova Testamentoj tradukitaj el la originalaj lingvoj*. Brita kaj Alilanda Biblia Societo, Londono, Britujo; Nacia Biblia Societo de Skotlando, Edinburgo [Britujo], sen dato.

La *Malnovan Testamenton* tradukis Zamenhof, sed poste “Biblia Komitato” reviziis la tekston (laŭ peto de Zamenhof). Ekzemploj el la *Malnova Testamento* estas do plej ofte plene zamenhofaj, sed iafoje povas esti diferenco inter la biblia teksto kaj la origina zamenhofa traduko. Ĉiuj tekstoj en la Malnova Testamento estas legeblaj kaj priserĉeblaj ĉe *<https://tekstaro.com/t?nomo=malnova-testamento>*.

Ciferoj post mallongigo de biblia libro montras numeron de ĉapitro.

La jenaj mallongigoj de bibliaj libroj estas uzataj en *PMEG*:

| | | | |
|---|---|---|---|
| **AK** | *Alta Kanto de Salomono* | **Kr2** | *Kroniko, Libro Dua* |
| **Am** | *Amos* | **Lv** | *Levidoj, Tria Libro de Moseo* |
| **Cf** | *Cefanja* | **Mĥ** | *Miĥa* |
| **Dn** | *Daniel* | **Ml** | *Malaĥi* |
| **Er** | *Eliro, Dua Libro de Moseo* | **Naĥ** | *Naĥum* |
| **Es** | *Ester* | **Neĥ** | *Neĥemja* |
| **Ez** | *Ezra* | **Nm** | *Nombroj, Kvara Libro de Moseo* |
| **Gn** | *Genezo, Unua Libro de Moseo* | **Ob** | *Obadja* |
| **Hŝ** | *Hoŝea* | **Pk** | *Plorkanto de Jeremia* |
| **Ĥb** | *Ĥabakuk* | **Pr** | *La Predikanto* |
| **Ĥg** | *Ĥagaj* | **Ps** | *La Psalmaro* |
| **Ij** | *Ijob* | **Re** | *Readmono, Kvina Libro de Moseo* |
| **Jes** | *Jesaja* | **Rĝ1** | *Reĝoj, Libro Unua* |
| **Jĝ** | *Juĝistoj* | **Rĝ2** | *Reĝoj, Libro Dua* |
| **Jĥ** | *Jeĥezkel* | **Ru** | *Rut* |
| **Jl** | *Joel* | **Sm1** | *Samuel, Libro Unua* |
| **Jn** | *Jona* | **Sm2** | *Samuel, Libro Dua* |
| **Jr** | *Jeremia* | **SS** | *La Sentencoj de Salomono* |
| **Js** | *Josuo* | **Zĥ** | *Zeĥarja* |
| **Kr1** | *Kroniko, Libro Unua* | | |

# Indekso


## A

A...
elparolo...23, 24
finaĵo...51-54, 240
liternomo...15, 16, 312, 313
tabela postparto...240
A-eca vorteto...705
A-finaĵo...51-54, 240
landonomo...552, 553
lingvonomo...554, 555
liternomo...312
nombrovorto...375-377
ON-vorto...376
participo...435-437
perverba priskribo...395
popolnomo...553
pronomo...106, 107
rolvorteto...234
vortfarado...566-570, 580, 581
A-vorta frazparto...64, 65, 705
A-vorta nombrovorto...375-377
A-vorteca vorteto...297-313, 705
A-vorto...51-54, 155, 705
aga...567
duobla...408
J-finaĵo...70-73
kvanta...387, 388
O-vorteca...52
perverba priskribo...395, 400, 402
pozicio...59
priskribo...64, 65
priskribo de E-vorto...389, 390
priskribo de vorteto...391
signifo...566-570
simila al ITA-formo...569
uzo...51-54
AB (sufikso)...662, 697
Ablativa adjekto = *de*-komplemento, *el*-komplemento...147-156, 201, 711
AC (sufikso)...662
AĈ...588
diferenco de *fi*...658
AD...69, 588-590
*Adiaŭ*, *Adiaŭi*...329
Adicio...322, 323
Adjektiva radiko = eca radiko...711
Adjektivo = A-vorto...711
Adjekto = komplemento...711
ADOR (sufikso)...663, 697
Adverbo = E-vorto, E-vorteca vorteto. 711
Afikseca...
KELK...650
radiko...649-659
vorteto...657-659
Afikso...587-659, 661-683, 705
difino...587, 588
greka/latina...661
ĥemia...683
interliga finaĵo...587
neoficiala...661-683
nova...661
oficiala...587-659
ŝajna...585, 586
Afrikato = ekfrota konsonanto...25, 711
AFRO (prefikso)...674, 697
Aga radiko. 565, 567, 572, 588, 590, 608, 612
Aganto...106, 475, 476
pasivo...449-451
Agento = aganto (en pasiva frazo)...449-451, 711
*Ajn*...276, 277
KI-vorto...277
*Ajna*...277
AĴ...590-592
participo...439, 440
Akcento...23, 101, 365
emfaza...279
erara...247
foresto...31, 32
fremda vorto...35, 36
kroma...30
Aktiva participo...435
*Aktiveco*...598
Aktivo...38, 705
Akuzativa objekto = objekto...711
Akuzativo = N-finaĵo...130-144, 711
*Al*...196, 199
anstataŭ *de*...198
nerekta objekto...134
rolvortaĵo...232
sen N-finaĵo...142
senca subjekto...419
AL (sufikso)...662

*Al* anstataŭ *de*....................................199
*Al tio*..................................................199
*Al*-komplemento...............................459
I-verba.........................................421
pasivigo................................455, 456
Alfabeta ordo................................15, 16
fremdaj literoj..................................20
Alfabeto........................................15, 16
literuma.......................................313
ne-latina.......................................544
ALI-vorto..................................241-243
*Alia*..............................53, 241-243, 370
*Alia ol*..............................................339
*Alie*...........................................241-243
*Alie ol*..............................................339
*Aliel*..........................................241-243
*Alies*..................................241-243, 586
*Aligi*, *aliĝi*........................................200
*Aliio* (k.s.)........................................243
*Alio*...........................................241-243
*Aliu*...........................................241-243
*Aliula*..............................................243
*Almenaŭ*...................................277, 278
Alparolato................................128, 129
Alternativa subjekto..........................461
Alternativdemando....................326, 356
Alvoko.....39, 40, 44, 78, 128, 129, 489, 705
al potenco....................................129
*ho*...............................................330
*per*..............................................220
AM (sufikseca)..........................603, 649
*Ambaŭ*................................98, 311, 312
*Amen*...............................................332
AN..........................................592, 593
diferenco de IST...........................624
erara uzo.....................................550
landano.................................548, 549
superflua......................................621
ANC (sufikso)...................................663
*Ankaŭ*.......................................278, 279
postmetita....................................278
*Ankoraŭ*...................................254, 255
*Ankoraŭ* kaj *plu*...............................263
*Ankoraŭ ne*.......................................259
*Ankore*...............................................38
*Anno*.........................................32, 33
*Ano*...................................................549
*Anstataŭ*............................................206
I-verbo..........................................427
*Anstataŭ (tio) ke*................................206
*Anstataŭa*..........................................207
Anstataŭa skribomaniero.......................16
*Anstataŭe*..........................................208
*Anstataŭi*, *anstataŭigi*.........................208
ANT.........................................435-447
*Antaŭ*.................................................163
horo.......................................383, 384
I-verbo..........................................428
*Antaŭ (tiam) kiam*...............................521
*Antaŭ ke*............................................530
*Antaŭ kiam*................................517, 530
*Antaŭ ol*.....................................428, 443
*Antaŭa*................................................166
Antaŭa vokalo......................................24
*Antaŭe*.......................................166, 443
Antaŭelemento preciziga.............573-580
*Antaŭen*.............................................166
*Antaŭhieraŭ*.......................................257
nerekta parolo........................534, 535
Antaŭmetado de frazparto...........538-542
*Antaŭo*...............................................166
Antaŭparto de tabelvorto....................237
Antaŭpriskribo.....................................63
ANTI (prefikso)....................................674
*Aparteni*..............................199, 459, 461
Aparteno....................................309-311
*Apenaŭ*.......................279, 280, 352, 526
*Aperi*..................................................398
postmetita subjekto.........................134
Apostrofo.....18, 23, 43, 68, 101-104, 566
A-vorto........................................103
AŬ-vorto......................................103
disiga...........................................103
ekkria vorto..................................331
imagata..........................................36
*l'*...........................................101, 102
neuzado........................................104
nezorga elparolo............................103
Apozicio = apudmeto..........................711
*Apud*..................................................166
*Apuda*.................................................167
*Apude*.........................................167, 234
Apudmeto..............78, 124, 405-409, 705
komenta........................................409
longa listo.....................................406

AR.....593, 594
ARĤI (prefikso).....674
ARI (sufikso).....663, 697
ARKI (prefikso).....674
Artikolo.....77-95
difina.....77-95
AS-finaĵo.....412
anstataŭ IS-finaĵo.....412
eterna.....412
= *estas*.....469, 470
*Aspekti*.....398
Aspektismo (= itismo).....453, 454
Asterisko.....18
AT.....435-447, 451
ripeto.....453
teoria eblo de plenumiĝo.....452
Atismo.....444
ATO (prefikso).....681
ATOR (sufikso).....663
*Aŭ*.....73-76, 317-319
alternativa nomo.....319
ekskluziva/inkluziva.....318, 319
komo.....17
korekto.....319
sekvo.....319
tuta frazo.....318
vortostumpoj.....323
*Aŭ ... aŭ*.....325
AŬDIO (prefikso).....675, 697
AŬTO (prefikso).....675, 698

B

B, elparolo.....25, 26
*Baldaŭ*.....255
*Baldaŭa*, *baldaŭe*.....255
*Bati*.....460, 461
*Be* (mallongigo de *bemola*).....337
*Bemola*.....337
*Biblio*.....91, 724
Bibliografio.....717-724
Bilabialo = lipa konsonanto.....711
*Biliono*.....372, 668
BIO (prefikso).....675
*Bis*, *Bisi*.....329
BIT (prefikseca).....650
BO.....635, 636, 692
*Bo* (liternomo).....15, 16, 312, 313
*bofilo*.....635
*bofrato*.....635, 636
*Bonan tagon*.....489
*Bonvole*.....415
*Bonvolu*.....415
*bopatro*.....635
Brajla skribo.....16

C

C, elparolo.....25-28
Celo.....196
subkomprenata.....141
*Cent*.....363-365
CENTI (prefikso).....681
Cento.....363
*Certa*.....
anstataŭ *unu*.....97, 370
individueca.....97, 370
*Ci*.....105, 109
*Ci*-diri.....109
*Cia*.....106, 109
Cifero.....19, 365, 367, 373, 374, 383-385
*Cii*.....109
Cirkumflekso.....16
*Cis*.....335
*Cit*.....19
Citaĵo.....559-561
citilo.....19
frazo.....488
*Co* (liternomo).....15, 16, 312, 313

Ĉ

Ĉ, elparolo.....25-28
Ĉapelo.....16
*Ĉar*.....525
ĉeffrazo.....525
*Ĉar* kaj *tial*.....266
*Ĉe*.....167
ĈEF.....636, 637
*Ĉefa*, *ĉefe*.....637
Ĉefelemento de kunmetaĵo.....573-580
Ĉeffrazo.....38-41, 493, 494, 705
Ĉeflitero.....15, 16
*Ĉefo*.....637
Ĉefpropozicio = ĉeffrazo.....493, 494, 711
Ĉefverbo.....38, 39, 457-468, 705
forlaso.....488, 489
Ĉefvorto.....41, 705
forlaso.....491, 492

*Ĉesi*...482, 483
*Ĉesigi*...483
*Ĉesiĝi*...466
*Ĉi*...247-250
erara skribo...247
kvazaŭ difinilo...95-98, 248
memstara...248
prefikseca...249, 657
*Ĉi ĉio*...305
*Ĉi lasta*...249
*Ĉi-kune*...216
*Ĉi-libro*...248
*Ĉi-sube*...187
*Ĉi-supre*...190
*Ĉi-tiu*...247
ĈI-vorto...239, 240
*Ĉia*...307-309
*Ĉial*...265-267
*Ĉiam*...251-253
*Ĉian* = *ĉiam*...253
*Ĉie*...245-247
*Ĉiea*...247
*Ĉiel*...267-271
*Ĉien*...142
*Ĉies*...309-311
*Ĉio*...302-306
apudmeto...407
*Ĉiom*...272-276, 390, 391
*Ĉioma*...276
*Ĉirkaŭ*...169
E-vorteca...378
horo...384
nuancilo de nombro/kvanto...377, 378
subjekto...378
*Ĉirkaŭa*, *ĉirkaŭe*...170
*Ĉirkaŭi*, *ĉirkaŭigi*...170
*Ĉiu*...75, 177, 297-302
anstataŭ *po*...223
*Ĉiuj*...85, 300
*Ĉiuj du*...311, 312
ĈJ...594, 595
parencovorto...691
*Ĉo* (liternomo)...15, 16, 312, 313
*Ĉu*...355, 356, 504, 505
duobla...325, 326
forlaso...356, 357
*Ĉu ... aŭ*...326
*Ĉu ... ĉu*...325, 326
ŝajna...326
*Ĉu* kaj *se*...506
*Ĉu*-demando...355, 356

## D

D, elparolo...25, 26
*Da*...157-163, 373, 387
baza nombrovorto...367
forlaso...374
malnova uzo...162
memstara...161
N-finaĵo...158
neskribita...373
*tiu*...161
*Da*-esprimo...157
kvazaŭ ĉefvorto...387, 389
memstara...157
*Da*-ismo...162
*Danci*...458
*Dank' al*...102
*Danke* + N-finaĵo...102
*Danke al*...102
*Danki*...462
*Danki por*...226
*Danki pro*...226, 230
Dativa objekto, dativo = *al*-komplemento. 711
Dato...53, 367, 384, 385
N-finaĵo...384, 385
skribo...385
*Daŭri*...482
*Daŭrigi* kun I-verbo...484
Daŭro...225
*De*...148, 150, 151, 154-156
aganto...154
aganto en pasivo...449-451
anstataŭ *al*...200
aparteno...151, 405
E-vorteca...378
E-vorto...232
eco...152
erare uzata...405
formovo...148, 153
horo...383
konsisto...153
malsimileco, distingo, aparteco...148
*meze de*, *komence de*...232
mezuro...153
monatonomo...384

nombrovorto....373
*norde de, dekstre de*....232
nuancilo de nombro/kvanto...377, 378
objekto....150
origino....148
perverba priskribo....153
prefikseca....658
rilate al A-vorto....155
rilate al aga O-vorto....150
rilate al E-vorto....155
rilate al O-vorto ne-aga....151
rilate al participo....154
rilate al verbo....148
rilate al vorteto....156
sen N-finaĵo....142
tempo....149
*De* kaj *per*....221
*De kiu*....514
*De la fino de*....149
*De la flanko (de iu)*....153
*De la komenco de*....149
*De post*....149
*De tempo al tempo*....200
DECI (prefikso)....681
Decimala komo....381
Decimalo....17
*Defali*....139
*Definitive*....451
*Dek*....363-365
DEKA (prefikso)....681
Deklara frazo....485
Deko....363
*Dekono*....372
*Deloke de*....150
Demanda frazo....485, 486
Demanda subfrazo....503-506
Demando....17, 355-361
alternativa....326, 356
elparolo....357
nea....358-361
Demandosigno....17
Demandovorto....238, 239
Denta konsonanto....25
Dentalo = denta konsonanto....711
*Depost*....149
*Des*....326-328
anstataŭ *tiom*....327
kroma motivo....327
*Des ... des*....328
DES (prefikso)....675
*Detempe de*....150
*Devi*....419, 476-481
neado....480
*Devus*....481
*Di* (mallongigo de *diesa*)....337
*Diesa*....337
Difina artikolo....77-95
Difinilo....77-98, 705
*ĉi*....95-98
pli ol unu....98
poseda pronomo....95-97
pozicio....59
Diftongo....24, 28, 705
Direkta N-finaĵo....139-143
Direkta rolvorteto....196-206
sen N-finaĵo....142
Direkto....139-143, 196
figura....141
inversa....179
senmova....197
sola N-finaĵo ĉe O-vorto....142
DIS....637, 638
= MAL....638
*Disde*....147, 148, 154, 637
Distingiga paŭzeto....31
*Disvolvi*....638
Dividostreko....18, 21
mallongigo....18
nombrovorto....365
OBL/ON/OP....626
vicorda nombrovorto....375
DĴ, elparolo....28
*Do*....280
*Do* (liternomo)....15, 16, 312, 313
*Doni*....459
*Du*....363-365
Dua persono....108, 109
*Dua plej*....289
*Duiliardo*....668
*Duiliono*....668
*Dum*....208
I-verbo....429
*ne*....527
tempa *en*....173
*Dum (tiam) kiam*....521
*Dume*....208, 234
Duobla A-vorto....408

Duobla E-vorto....408
Duobla konsonanto....32
Duobla neado....352
Duobla O-vorto....405-409
*Duobla vo*....20
Duobla vokalo....32
Duobla vorteto....408
DUON (prefikseca)....692
*Duon(hor)o*....383
Duonbara konsonanto....25
Duondifina artikolo....97, 369
Duondifina *unu*....97, 369
Duonvokalo....23, 25, 26, 28, 29, 705
Dupunkto....17

## E

E....
 elparolo....23, 24
 finaĵo....55-57, 240
 liternomo....15, 16, 312, 313
 tabela postparto....240
E (sufikso)....663, 664, 698
E-eca vorteto....706
E-finaĵo....55-57, 240
 nombrovorto....377
 participo....437-439
 perverba priskribo....396, 397
 rolvorteto....234
 vortfarado....571
E-vorta frazparto....65, 66, 706
E-vorta nombrovorto....377
E-vorteca vorteto....245-296, 706
E-vorto....55-57, 155, 706
 *de*....155
 duobla....408
 kunskribita kun A-vorto....408
 kvanta....388-390
 loka....234
 nuancilo....56, 57
 objekto....450
 perverba priskribo....396, 397, 401
 priskribo....64-66
 priskribo de I-verbo....396
 priskribo de nenio....397
 priskribo de O-vorto....441
 priskribo de subfrazo....396
 priskribo de tuta frazo....55, 439
 semajntago....139
 tempa....61, 62
 uzo....55-57
EBL....595, 596
 pasiva....455
*Eblaĵo*....597
*Ebleco*....597
*Eblo*....597
EC....596-599
 participo....440
 tempo....598
Eca radiko..565, 566, 579, 590, 596, 608, 612, 631
*Eĉ*....281
*Eĉ ne*....354
*Eĉ se*....529
ED (sufikso)....664
EG....599, 600
Egaleco-signo....19, 381
Egalo-signo....19, 381
EJ....600-602
EK....638, 639
*Ek!*....331
*Ekde*....147, 149, 154, 639
*Ekesti*....471
Ekfrota konsonanto....25, 28
Ekkria frazo....486, 487
Ekkria vorteto....329-333, 640, 706
 el ordinara radiko....331
Ekkrio....103
 *pro*....230
EKO (prefikso)....676
EKS....639, 640
*Eks!*....331
EKSA (prefikso)....681
Eksafikso....586, 706
EKSBI (prefikso)....682, 698
*Ekskluzive*....205
*Ekskluzive de*....210
Eksploda konsonanto....25
*Ekster*....171
*Ekster(aĵ)o*....172
*Ekstera*....172
*Ekstere*....172, 234
*Eksteren*....234
*Eksterna*....172
Ekzercaro de la Fundamento....31, 109, 113, 685-690, 721
*El*....201
 *el inter*....203, 288

komplete/ĝisfine.............................655
origino.............................153
*plej*.............................288
prefikseca.............................655
sen N-finaĵo.............................142
*El de*.............................148, 154
*El sub*.............................187
Elcento-signo.............................20
*Elde*.............................148, 154
*Elektiĝi*.............................398
*Eligi*, *eliĝi*.............................203
*Eliri*.............................139, 417, 655
Elnombrado.............................
*aŭ*.............................318
eviti N-finaĵon.............................406
*kaj*.............................315
Elparolo.............................23-36
esperanteca.............................34-36, 543-545
konsonanto.............................25-30
mallongigo.............................33
ne-Esperanta litero.............................34
ne-Esperanta vorto.............................34-36
neregula sed tolerebla.............................27
vokalo.............................23-25
*Elrigardi*.............................655
Elspira konsonanto.............................27
EM.............................602-604
Emfazo.............................
antaŭmetado.............................538, 539
*ja*.............................281
rilata subfrazo.............................511
vortordo.............................537
*En*.............................172
figura.............................174
konsisto.............................203
N-finaĵo.............................174
ne signifas *post*.............................173
statoŝanĝo.............................175
tempo.............................173
EN (sufikso).............................664
*En si*.............................126
*Ena*, *ene*, *enen*.............................175
END.............................604, 620
pasiva.............................437, 455
simila al U-modo.............................437
*Enigi*, *eniĝi*.............................175
ENZ (sufikso).............................664, 698
Epiteto = rekta priskribo.............................711
ER.............................604, 605
*Escept(int) e*.............................210
*Escepte de*.............................210
*Esceto* (ß).............................20
ESK (sufikso).............................664
Esperanteca elparolo.............................34, 35, 543-545
Esperantigita nomo.............................545-548
Esperantigo de nomo.............................545-548
*Esperanto* (participo).............................441
*Estante*.............................345
*Este*.............................345
*Esti*.............................52, 395-400, 457, 460, 469, 470
participo.............................441-447
= *troviĝi*.............................469
*Estiel*.............................336, 345
*Estkiel*.............................345
ESTR.............................605
diferenco de ĈEF.............................637
*Eŝo*.............................48
ET.............................606, 607
EŬRO (prefikso).............................676, 698
Evoluo.............................48, 49, 429, 430, 505, 633


## F


F, elparolo.............................25, 26
Faka lingvaĵo.............................381
Familiano.............................691-693
*Far*.............................335
*Fare de*.............................150, 154, 335, 450
*Fari*.............................472, 473
*Fariĝi*.............................52, 395-400, 457, 460, 471
FEMTO (prefikso).............................681
*Ferma*.............................569
Festonomo.............................94
*je*.............................145
majuskla.............................557
*Fi*.............................330
prefikseca.............................657
FIN.............................
prefikseca.............................655
sufikseca.............................650
Finaĵo.............................37, 706
A.............................51-54, 240
afikso.............................587
AS.............................412
E.............................55-57, 240
I.............................411, 417-433
interliga.............................575, 576
IS.............................412, 413
J.............................43, 51, 67, 106, 305, 306

N.....43, 51, 55, 67, 105, 106, 127-235
O.......................................43-49, 240
OS........................................413, 414
U...........................240, 414, 415, 710
US.........................415, 416, 529, 706
verba....................................411-416
vortklasa..................37, 566-573, 710
*Finiĝi per/je*.....................................220
Finitivo = ĉefverbo............................711
*Finnlando*..................................33, 547
*Finno*............................................32, 33
*Fino*........................................................
anstataŭ *finiĝo*..............................432
*Fo* (liternomo)................15, 16, 312, 313
*Fojo ke/kiam*.....................................497
Fonto de ekzemploj....................721-724
*For*....................................248, 250, 251
ekkria...........................................250
malproksime.................................250
mova............................................250
prefikseca....................................655
*For de*...............................148, 154, 156
*Fora*, *fore*, *foren*...............................251
Frakcistreko..............................227, 382
Frazenkondukilo........................494, 706
Frazeto...............................580-584, 706
Frazetvortigo.............................580-584
streĉita.........................................584
Frazetvorto..........580-584, 649-659, 706
Frazfunkcio...............................485-487
Frazmelodio......................................357
Frazo.....................................38-41, 706
citaĵo............................................488
deklara.........................................485
demanda..........................17, 485, 486
ekkria...................................486, 487
komenta........................487, 488, 513
kompleksa............................487, 488
mallongigita...................397, 488-492
ordona.....................................17, 486
pasiva...................................449-456
pasivigebla............................454-456
sensubjekta...........113, 397, 457, 469
Frazospeco................................485-492
Frazparto.....................38-41, 59-66, 706
A-vorta.....................................64, 65
antaŭmetado..........................538-542
E-vorta.....................................65, 66
O-vorta.....................................59-63
priskribo de E-vorto..................65, 66
priskribo de O-vorto.........................60
rolvorteto................................144-235
sen rolmontrilo........................127-129
Frazrolo.....38, 39, 144-235, 457-468, 706
Fraztipo......................................485-487
Fremda vorto..................................34-36
*Fri*....................................................336
Frikativo = frota konsonanto...............711
Frota konsonanto.................................25
Fundamento de Esperanto. 13, 16, 19, 28, 31, 32, 97, 103, 109, 113, 233, 278, 335, 365, 376, 381, 393, 453, 454, 470, 526, 547, 557, 558, 569, 570, 577, 582, 585, 685-690, 721
FUŜ (prefikseca)................................650
Futuro = venonta tempo......................711


## G


G, elparolo......................................25, 26
GE..................................46, 48, 640-642
BO kaj PRA...................................636
en unu-nombraj vortoj....................641
parencovorto..................................691
Gentonomo................................549, 550
*Gepatro*.............................................641
Gerundio = participo kun E-finaĵo......711
GIBI (prefikso)...........................682, 698
GIGA (prefikso)................................681
Gingiva konsonanto.............................25
Gingivalo = gingiva konsonanto.........711
Glota konsonanto.................................25
*Go* (liternomo)................15, 16, 312, 313
Grado...........................267-271, 391-393
emfaza...........................................275
Gramatiko...........................................37
Fundamenta Gramatiko...19, 103, 685-690
sekso..........................................44-49
superrigardo................................37-41
termino..................................705-716
tradicia vorto...........................711-716
vortareto.................................705-712
Granda litero..................................15, 16
*Graŭ*...................................................336
Greka liternomo...................................20
Grupa O-vorto...................................177
Grupo kun po unu................................74
GV, elparolo........................................27

## Ĝ

Ĝ, elparolo....25, 26, 28
Ĝentila peto....415
*Ĝermana vo*....20
*Ĝi*....105, 111-113
  anstataŭ *tio*....112
  besto....111
  grupo....112
  ĝiismo....111, 113
  homo....111-113
  infaneto....111
  neuzenda....113
  superflua....113
*Ĝia*....106, 107, 111-113
Ĝiismo....111, 113
*Ĝis*....203, 527, 528
  E-vorteca....378
  ĝis-streko....19
  horo....384
  I-verbo....429
  inkluziva....205
  *ne*....527
  nuancilo de nombro/kvanto...377, 378
  salutvorto....204, 329
  sen N-finaĵo....142
*Ĝis (la) (revido)*....204, 329
*Ĝis (tiam) kiam*....521
*Ĝis kiam*....527
Ĝis-streko....19
*Ĝisi*....206
*Ĝiso*....206
*Ĝo* (liternomo)....15, 16, 312, 313
*Ĝoji*....458

## H

H....
  anstataŭ supersigno....16
  elparolo....25, 26
  voĉa....27
H-skribo....16
*Ha*....330, 332
*Ha lo*....330, 332, 333
Haltostreko....18
*Havi*....460, 471
*He*....330
HEKTO (prefikso)....681
Helpa *tia*....529
Helpa *tial*....525
Helpa *tiel*....529
Helpa *tio*....112, 495-497, 499, 503-506
*Helpi*....459
Helposigno....16-21
  elparolata....19, 20
  ne-elparolata....16-19
Helpverbo....469, 470, 476-481
HEMI (prefikso)....680
*Hieraŭ*....255-258
  nerekta parolo....534, 535
*Hieraŭa*, *hieraŭo*....258
HIPER (prefikso)....676
*Ho* (liternomo)....15, 16, 312, 313
*Hodiaŭ*....255-258
  nerekta parolo....534, 535
*Hodiaŭa*, *hodiaŭo*....258
*Hodie*....38
Hoketo....16
*Homino*....46
Homonimo....565
Horo....53, 139, 383, 384
  *antaŭ*....383, 384
  *ĉirkaŭ*....384
  *de*....383
  demando....383
  *ĝis*....384
  *je*....384
  N-finaĵo....384
  *post*....383, 384
*Hura*....330, 333

## Ĥ

Ĥ....
  alternativo....29
  elparolo....25, 26, 29
*Ĥo* (liternomo)....15, 16, 312, 313

## I

I....
  elparolo....23-25, 29
  finaĵo....411, 417-433
  liternomo....15, 16, 312, 313
  vortfarado....572, 573
I (sufikso)....664-666
I-finaĵo....411, 417-433
  perverba priskribo....397
I-modo....411, 707
I-verba frazparto....417
I-verbo....52, 411, 417-433, 468, 707
  alia subjekto....421-423
  anstataŭ U-modo....431

citata ........................................ 430
ĉefverbo ........................................ 431, 432
diferenco de ADO-formo ........ 432, 433
en programa menuo ........................ 431
*krom* ........................................ 427
mova verbo ........................................ 426
nerekta parolo ........................................ 533
objekto ........................ 420, 450, 455
ordona ........................................ 431
pasivigo ........................................ 454, 455
perverba priskribo .. 397, 403, 418, 423
*por* ........................................ 426, 427
*povi*, *devi* kaj *voli* .................. 476-481
*povi*/*devi*/*voli* ................................ 419
*pri*-komplemento ........................ 420
priskribo ........................................ 65, 66
priskribo de A-vorto ........................ 425
priskribo de E-vorto ........................ 425
priskribo de O-vorto ............. 424, 425
*promesi* ........................................ 422
rekta priskribo ........................ 424, 425
rolvorteto ........................................ 425-430
*se* ........................................ 431
*sen* ........................................ 428
senca subjekto ........ 417, 419, 421-430
subjekto ........................................ 418, 419
I-vorto ........................................ 239
*Ia* ........................................ 307-309
*Ial* ........................................ 265-267
*Iam* ........................................ 251-253
*Iama* ........................................ 253
*Ian* = *iam* ........................................ 253
IĈ (sufikso) ........................ 49, 666, 699
ID ........................................ 607, 608
Identiga priskribo ......... 60, 129, 404, 405
*Ie* ........................................ 245-247
*Iel* ........................................ 267-271
*Iele* ........................................ 271
*Ien* ........................................ 142
*Ies* ........................................ 309-311
IF (sufikso) ........................................ 666, 699
IFA (Internacia Fonetika Alfabeto) .... 24, 26
IG ........................................ 608-612
anstataŭ IZ ........................................ 669
post IĜ ........................................ 463
IG-verbo ...................... 462-464, 608-612
el IĜ-verbo ........................................ 463
*si* kaj *sia* ........................................ 125
*Igi* ........................................ 473, 474, 476
IĜ ........................................ 612-615
diferenco de EK ........................ 639
IĜ-verbo ........................ 464-467, 612-615
*Iĝi* ........................................ 395-400, 471
IK (sufikso) ........................................ 667
*Ikso* ........................................ 20
IL ........................................ 615-617
*Ili* ........................................ 105, 113, 114
*Ilia* ........................ 106, 107, 113, 114
ILIARD (sufikso) ........................................ 668
ILION (sufikso) ........................................ 668
Imaga modo. 415, 416, 503, 524, 529, 706
*devi*/*povi*/*voli* ........................................ 481
Imperativo = vola modo, U-modo, U-verbo ........................ 414, 415, 711
IN ........................................ 46, 618, 619
parencovorto ........................................ 691
virina nomo ........................................ 548, 691
Ina radiko ........................ 44, 45, 48, 619
IND ........................................ 619, 620
pasiva ........................................ 455
Indikativo = reala modo ........................ 711
Infinitivo = neŭtrala modo, I-modo, I-verbo ........................................ 711
INFRA (prefikso) ........................................ 676
ING ........................................ 620, 621
*Inkluzive de* ........................................ 210
INT ........................................ 435-447
+ US-finaĵo ........................................ 447
*Inter* ........................................ 175
nuancilo de nombro/kvanto ..... 377, 378
prefikseca ........................................ 371
tempa ........................................ 178
*Inter si* ........................................ 126, 371
*Intera*, *intere* ........................................ 178
*Interalie* ........................................ 241
Interjekcio = ekkria vorteto ................ 711
*Interna*, *interne* ........................................ 178
Interogativo = demanda vorteto. 355-361, 711
*Io* ........................................
subkomprenata ........................................ 512
*Iom* ........................ 272-276, 390, 391
diferenco de *malmulte* ........................ 273
*Iom el* ........................................ 160
*Ioma* ........................................ 276
*Iomete*, *iometo* ........................................ 276
IP (sufikso) ........................ 49, 668, 699

*Ipsilono*...20
IS-finaĵo...412, 413
ISM...621-624
ISM kaj IST...623
IST...623-625
    diferenco de AN...624
    figura...624
ISTAN (sufikso)...551, 668, 699
*Iŝi*...336
IT...435-447, 451
IT (neoficiala sufikso)...669
Itismo...453, 454
*Iu*...297-302
    anstataŭ *unu*...97, 370
IV (sufikso)...669
IZ (sufikso)...573, 669, 670

J

J...
    elparolo...25, 26, 28, 29
    finaĵo...43, 51, 67, 106
    frota sono...29
    pozicio...29
J (sufikso)...670, 699
J-finaĵo...43, 51, 67, 106, 305, 306
    A-vorto...70-73
    liternomo...312, 313
    nombrovorto...373
    O-vorto...68-70
    ON-vorto...76
    poseda pronomo...106
    speciala okazo...73-76
    uzado...67-76
*Ja*...281, 358
*Jam*...258-260, 443
*Jam antaŭe*...443
*Jam ne*...259
*Jarmilo*/*miljaro*...582
Jaro...367, 384, 385
*Je*...145-147
    horo...384
    korpa/anima stato...146
    korpoparto...146
    malsano...146
    rekta objekto...147
*Je la unua fojo*...225
*Jen*...281, 282, 523
*Jen ... jen*...326
*Jena*...282
*Jene*...282
*Jeno*...282
*Jes*...357, 358
    nea demando...358-361
*Jes ja*...281, 360
*Jesa*, *jesi*...361
*Jesigi*...361
*Jo* (liternomo)...15, 16, 312, 313
JOBI (prefikso)...682, 699
JOKTO (prefikso)...681
JOTA (prefikso)...681
*Ju*...326-328
    subkomprenata...327
*Ju ... des*...326-328
*Ju ... tiom*...327

Ĵ

Ĵ, elparolo...25, 26
*Ĵo* (liternomo)...15, 16, 312, 313
*Ĵus*...260, 261, 443
    anstataŭ *ĝuste*...261
    anstataŭ *tuj*...261
*Ĵusa*...261

K

K...
    anstataŭ Ĥ...30
    elparolo...25, 26
    mallongigo de *kaj*...20
K, elparolo...27
*Kaj*...315-317
    anstataŭ *sed*...321
    forlaso...316
    KI-vorto...539
    komo...17
    signo...20
    simbolo...20
    tuta frazo...316
    vortostumpoj...323
*Kaj ... kaj*...328
*Kaj/aŭ*...319
Karesnomo...594, 595, 625
*Kaŭ*...319, 337
Kaŭzo...148, 229
*Ke*-frazo...494-503
    celo...500
    eblo...503
    kaŭzo...498
    komplemento...496, 497
    memstara...414, 415

motivanta.....499
objekto.....495, 496
opinio.....502
perverba priskribo.....498
rekta priskribo.....497-499
rezulto.....499, 502
sen *ke*.....499
subjekto.....494, 495
verbo.....499-503
KELK (afikseca).....650
*kelk*, vorteto.....650
*Kelkaj*.....75
*Kelke*.....75, 388-390
Kerno-vorto = ĉefvorto.....711
Kernovorto = ĉefvorto.....41
KI-demando.....355
KI-subfrazo.....506-523
KI-vorto.....238, 239, 504-516
demanda.....355
ekkria.....486, 487
fine de frazo.....355
forlaso.....523
mallogika.....277
pli ol unu en demando.....355
pozicio.....355, 540
rilata.....506-523, 532, 709
*Kia*.....307-309
anstataŭ *kiel*.....346
rilata.....518
*Kial*.....265-267
rilata.....519
*Kialo*.....267, 582, 583
*Kiam*.....251-253
rilata.....516
rolvorteto.....253
*Kian = kiam*.....253
KIBI (prefikso).....682, 699
*Kie*.....245-247
*en/ĉe/sur ... kiu*.....518
rilata.....517
*Kiel*.....267-271
anstataŭ *kia*.....346
grada.....392
kompara.....64-66, 122, 339-347
komparado kun verba esprimo.....344
nerekta parolo.....533
objekto.....341-344
reprezentas tutan frazon.....519
rilata.....519
rolmontrilo.....341-344
rolo, funkcio.....344-346
subjekto.....341-344
*Kiel ... tiel ankaŭ*.....271
*Kiel eble plej*.....290
*Kiel eble pli*.....392
*Kiel se*.....530
*Kiel*-esprimo.....
ne mallongigita frazo.....346, 347
perverba priskribo.....396
*Kien*.....142
rilata.....517
*Kies*.....309-311, 506-516
objekta.....515
rilata.....514
subjekta.....515
KILO (prefikso).....681
*Kio*.....302-306, 506-516
E-vorteca.....303
plurakonta subfrazo.....512-514
rilata.....511-514
*Kiom*.....272-276, 390, 391
anstataŭ *kiel*.....393
limiga.....519
rilata.....519
*Kiom eble (plej/pli)*.....290
*Kioma*.....276
*Kiomas*.....383
*Kiu*.....297-302, 506-516
forlaso.....510
rilata.....506
unua/dua aŭ tria persono.....125
*Ko* (liternomo).....15, 16, 312, 313
KO (prefikso).....677
Kofrovorto.....586
Kombino.....573-580, 582, 649-659, 707
streĉita.....584
*Komenci*.....482
*Komenco*.....
anstataŭ *komenciĝo*.....432
Komenta apudmeto.....409
Komentofrazo.....487, 488, 513
Komo.....17
decimala.....381
Kompara esprimo.....339-349
ĉu mallongigita subfrazo?.....346, 347
Kompara *kiel*.....61, 64-66
Kompara rolvorteto.....348, 349
Komparado.....
*apud*.....167

*ĉe*.....168
egaleca.....339
malegaleca.....339
Kompleksa frazo.....487, 488
Kompleksa verbo.....417, 418
Komplemento.....39-41, 707
E-vorta.....55, 56
mezura.....137
rolvorteto.....144-235
tempa.....145
tempopunkto.....138, 139
*Komplika*.....568
Konateco.....80-83
*Konatulo*.....440, 632
Kondicionalo = imaga modo, US-modo, US-verbo.....711
*Konfuza*.....568
Konjunkcio = kunliga vorteto...315-323, 711
Konsisto.....174, 203
Konsonanto.....23, 26, 707
denta.....25
duobla.....32
duonbara.....25
duonvokala.....25
ekfrota.....25, 28
eksploda.....25
elspira.....27
frota.....25
gingiva.....25
glota.....25
lipa.....25
lipdenta.....25
loko.....25
longeco.....28
naza.....25
senvoĉa.....26, 27
trema.....25
variado.....27
vela.....25
voĉa.....26, 27
*Kontraŭ*.....179
interŝanĝo.....181
*ke*-frazo.....497
sentdirekto.....182
*Kontraŭ (tio) ke*.....497
*Kontraŭa, kontraŭe, kontraŭi*.....182, 183
*Korano*.....91
*Korekta*.....568
Korelativa vorto = tabelvorto.....711
*Kovri*.....461
pasivigo.....452
Krampo.....18
*Krei*.....472
Krisigno.....17
*Krom*.....209
alternativo.....210
*Krom (tio) ke*.....211
*Kroma*.....212
Kromakcento.....30
*Krome*.....212
*Kun*.....212
peras priskribon.....403
prefikseca.....216
rolvortaĵo.....233
*Kun escepto de*.....210
*Kune*.....215
*Kune kun*.....213, 233
*kunigi, kuniĝi*.....216
Kunliga vorteto.....315-323, 707
Kunmetaĵo.....
frazetvorto.....580-584
kombino.....573-580
ŝajna.....585, 586
Kunmetita verbo.....
aktiva.....414, 442-444
alternativo.....443, 445
mallongigita.....446
nekutima.....446, 447
pasiva.....444, 445
triobla.....446, 447
Kunskribo.....407, 408
*Kuo*.....20
KV, elparolo.....27
*Kvankam*.....528, 529
mallongigita subfrazo.....528
*Kvankam* kaj *tamen*.....293
Kvanta A-vorto.....387, 388, 390
Kvanta E-vorto.....388-390
objekto.....450
Kvanta O-vorto.....387
Kvanta vorteto.....390, 391
Kvanto.....157, 158, 272-276, 387-393
distribua.....221
Kvantovorto.....387-393
nuancilo de nombro/kvanto.....377-380
*Kvar*.....363-365
*Kvaron(hor) o*.....383

*Kvazaŭ*.......................283, 284, 529, 530
anstataŭ kompara *kiel*....................348
N-finaĵo........................................348
prefikseca.....................................658
*Kvazaŭ*-esprimo, perverba priskribo. .396
*Kvazaŭ*-frazo.....................................533
KVEKTO (prefikso)..................681, 700
KVER (prefikso)................................677
KVETA (prefikso).....................681, 699
*Kvin*..........................................363-365
KZ, elparolo.......................................27

## L

L, elparolo....................................25-27
*L'*.............................................101, 102
*La*..................................................77-95
anstataŭ *ĉiuj*..................................85
anstataŭ poseda pronomo................85
apostrofo...............................101, 102
citaĵo..............................................88
E-vorto...........................................87
forlaso......................................88, 89
imagata difiniteco............................88
individuaĵo...............................78, 79
lingvonomo...........................554, 555
mallongigita propra nomo...............95
malpermeso....................................78
O-vorto...........................................77
poseda pronomo.............................96
propra nomo..............................88-95
pruntita de alia lingvo.....................93
speco.......................................83-85
*La jena/la jeno*.................................282
*La plej (mal) multaj*.............................87
*La plej bele*.........................................87
*La pli*................................................289
Labialo = lipa konsonanto...........25, 711
LAND (sufikseca).............549, 550, 651
Landano....................................548-555
Landonomo...............................548-555
A-finaĵo................................552, 553
du kategorioj..........................548-555
gentobaza..............................549-551
I-sufikso...............................549, 665
LAND-sufikso.............................550
landobaza......................548, 549, 551
UJ-sufikso.....................549, 550, 630
Laringalo = glota konsonanto......25, 711
*Lasi*..........................................474-476
I-verbo..........................120, 474, 475
Latina alfabeto................................15, 16
*Laŭ*....................................................216
kvazaŭ frazo...................................124
*Laŭe*...................................................217
*Laŭeble plej*........................................290
*Lavi*....................................................459
*Li*.......................................105, 110, 111
besto.............................................112
infano............................................111
nevivaĵo.........................................112
senseksa.........................................110
*Lia*.............................106, 107, 110, 111
Likvido = duonbara konsonanto....25, 711
Lingva evoluo..48, 49, 429, 430, 505, 633
Lingvonomo..........................86, 554, 555
A-finaĵo..........................................53
*la*......................................................95
majuskla........................................557
O-finaĵo......................86, 95, 554, 557
Lipa konsonanto..................................25
Lipdenta konsonanto............................25
Literaturo...................................717-724
Liternomo.................15, 16, 33, 312, 313
elparolo...........................................33
greka.......................................20, 337
hebrea...........................................337
ne-Esperanta....................................20
neoficiala.......................................337
Litero............................................15, 16
alfabeta ordo....................................20
duobla.............................................32
ne-Esperanta....................................20
nomo...............................33, 312, 313
Literuma alfabeto...............................313
*Lo* (ekkria vorteto)............................330
*Lo* (liternomo)................15, 16, 312, 313
LOG = OLOG (sufikso)......................671
LOGI = OLOGI (sufikso)...................672
Loka rolvorteto...........................163-196
N-finaĵo.........................................140
Longeco de konsonanto........................28
Longeco de vokalo...............................24

## M

M, elparolo.....................................25, 26
Majusklema skribo......................555-558
Majusklo.......................................15, 16
festo..............................................557
Fundamento..................................558

landonomo....557
lingvonomo....557
monato....557
popolnomo....557
propra nomo....555-558
semajntago....557
MAKRO (prefikso)....677
*Maksimume*....277
MAL....643-646
diferenco de MIS....647
Mal-mal-vorto....645
*Malantaŭ*....163, 165
*Malantaŭa*....166
Malantaŭa vokalo....24
*Malantaŭe*, *malantaŭen*, *malantaŭo*....166
*Malcit*....19
*Malĉi*....248
*Male*....361
*Malebla*....361
*Malferma*....569
Malgranda litero....15, 16
*Malgraŭ*....218
I-verbo....429
*ke*-frazo....218
*Malgraŭ (tio) ke*....529
*Malgraŭ* kaj *kvankam*....529
*Malhavi*....461
*Maljam*....286
*Malkiel*....271, 339, 643
Mallongigita frazo....397, 488-492
Mallongigo....17, 20, 312
dividostreko....18
elparolo....33
fonto....722
uzata en PMEG....695
*Malmulte*, diferenco de *iom*....273
Malnova Testamento....263
*Malplej*....289, 643
*Malpli*....326-328, 643
*ju ... des*....327
*Malpli ol*....339
nuancilo de nombro/kvanto....380
nuancilo de vorto....343
*Malsama ol*, *malsame ol*....339
*Malsuper*, *malsupera*....190
Malsuprenstreko....18
*Maltiel*....271
*Maltrans*....196
*Maltro*....295, 643
Malvasta vokalo....23
*Malviva*....567
Maniero....267-271
*Manki*....461
postmetita subjekto....134
Matematiko....16-21, 322, 323, 381, 382
greka litero....20
MEBI (prefikso)....682, 700
MEGA (prefikso)....681
*Meksikio*....665
*Mem*....284, 285
prefikseca....658
*Memo*....285
*Men*....336
META (prefikso)....677
METR = OMETR (sufikso)....672
METRI = OMETRI (sufikso)....672
Mezuro....135-138, 146, 157, 272-276, 382, 597
sen rolmontrilo....138
Mezurunuo....681, 682
Mezvasta vokalo....23
MF, elparolo....27
*Mi*....105, 107
*Mia*....106, 107
MIKRO (prefikso)....677, 678, 681, 682
*Miksa*....568
Miksita nombro....374, 375, 377
*Mil*....363-365
MILI (prefikso)....681
*Miliardo*....372
*Miliona*....376
*Miliono*....372, 668
*Miljaro*/*jarmilo*....582
Milo....363
MINI (prefikso)....678
*Minimume*....277
*Minus*....322, 323, 381, 382
anstataŭ *sed ne*....322
J-finaĵo....75
N-finaĵo....322
rolvorteto....322
signo....19
Minusklema skribo....555-558
Minusklo....15, 16
*Minuso*....323

Minuto....383, 384
MIRIA (prefikso)....682
MIS....646, 647
*Mo* (liternomo)....15, 16, 312, 313
Modo....411, 707
  imaga....415, 416, 481, 529
  neŭtrala....411, 417, 418, 707
  reala....411-414, 502, 523, 529, 709
  vola....414, 415, 710
Monato....384, 385
  majuskla....557
MONO (prefikso)....678
*Montriĝi*....398
Montrovorto....239
*Morgaŭ*....255-258
  nerekta parolo....534, 535
*Morgaŭa*, *morgaŭo*....258
*Morta*....567
*Morti*....458
*Mortigi*....458
*Mortiĝi*....466
*Mortinta*....567
Motivo....229
*Multe*....388-392
  objekto....388, 389
  subjekto....388, 389
*Multe pli*, *multe tro*....392
Multe-nombro....67-76, 707
Multipliko....625-627

## N

N-finaĵo....43, 51, 55, 67, 105, 106, 127-235
  alternativa objekto....131, 462
  anstataŭ *de*....150
  anstataŭ rolvorteto....131, 143
  *antaŭ*....164
  *apud*....167
  apudmeto....405
  *ĉe*....169
  *ĉirkaŭ*....169
  dato....139, 384, 385
  direkto....139-143
  *ekster*....171
  forlaso....559
  *inter*....177
  *kontraŭ*....179
  *kvazaŭ*....348
  liternomo....312
  loka E-vorto....142
  mallogika....143
  mezuro....135-138
  objekto....131-134
  persona pronomo....105
  pli ol unu N-frazparto....131
  poseda pronomo....106
  *post*....183
  pozicio....143
  *preter*....185
  propra nomo....546
  rolvortaĵo....233
  semajntago....139
  *super*....189
  *sur*....192
  tabelvorto....237, 238
  tempomezuro....135
  tempopunkto....138, 139
  *tra*....194
  *trans*....195
N-komplemento....135-144
N-priskribo....135, 139-144
N, elparolo....25, 26
*Na*....336
NANO (prefikso)....681
*Nasko*....
  anstataŭ *naskiĝo*....433
*Naŭ*....363-365
Naza konsonanto....25
Nazalo = naza konsonanto....25, 711
NĈ, elparolo....27
*Ne*....351-354
  diferenco de MAL....644
  dusignifa....358
  nea demando....358-361
  pozicio....351
  prefikseca....658
  respondvorto....358
*Ne eĉ*....354
*Ne jam*....259
*Ne plu*....263
*Ne povi*....479
*Ne tro*....295
*Ne voli*....481
Ne-aga radiko....572
Ne-Esperanta vorto....34-36
Ne-esperantigita nomo....543-545
Ne-PIV-a elemento en PMEG....697-704
*Nea*....361
Nea demando....358-361

Nea vorto....240
Neado....351-354
  duobla....352
Nedifina artikolo....97
Nedifinita vorto....239
Neduuma....48, 115, 668
*Neebla*....361
Negacio = neado, nea vorto....351-354, 711
*Nei*....361
*Neigi*....361
*Nek*....319, 354
  erara uzo....354
*Nek ... nek*....328
*Nen*....337
NENI-vorto....240, 351, 352
*Nenia*....307-309
*Neniaĵo*....240, 306
*Nenial*....265-267, 352
*Neniam*....251-253
*Nenian = neniam*....253
*Nenie*....245-247
*Nenieco*....240, 306
*Neniel*....267-271
*Nenien*....142
*Nenies*....309-311
*Nenii*....473
*Neniigi*, *neniiĝi*....240, 306, 349
*Nenio*....302-306
*Neniom*....272-276, 390, 391
*Nenioma*....276
*Neniu*....297-302, 366
Neoficiala....
  afikso....661-683
  liternomo....337
  prefikso....674-683
  rolvorteto....335, 336
  sufikso....662-674
  vorteto....331-333, 335-337
Nerekta objekto....134, 197, 707
Nerekta parolo....500, 531-536, 707
  *kiel*....533
  loka vorto....534, 535
  pronomo....535, 536
  tempa vorto....534, 535
  verboformo....531-533
Netransitiva verbo = senobjekta verbo.... 458, 464-467, 711
Neŭtrala modo....411, 417, 418, 707
Neŭtrala radiko....44, 48, 633
Neŭtrala vorto....618
NF, elparolo....27
NG, elparolo....27
NĜ, elparolo....27
*Ni*....105, 107, 108
  inkluziva/ekskluziva....535
  unu persono....108
*Nia*....106-108
NJ....625
  parencovorto....691
NK, elparolo....27
*No* (liternomo)....15, 16, 312, 313
Nombra vorteto....363-371
  A-finaĵo....375-377
  E-finaĵo....377
  memstare....366
  O-finaĵo....373
  pozicio....62
  uzado....365-367
Nombro....272-276
  gramatika....67
  kunskribado por hezito....408
  miksita....374, 375
Nombrovorto....363-385, 707
  A-finaĵo....375-377
  E-finaĵo....377
  grandega nombro....372, 373
  nuancilo de nombro/kvanto....377-380
  O-finaĵo....372-374
  priskribo de O-vorto....59
  skribo....365
  vicorda....367, 375, 376, 383, 384, 710
  vortordo....376
*Nome*....406
NOMIAL (sufikso)....670
*Nomiĝi*....398
Nominativa = sen rolmontrilo....127-129, 711
Nomo....543-558
  bazo de esperantigo....547
  elparolo....545
  esperantigita....545-548
  festo....94
  ina....547, 548
  karesa....594, 595, 625
  klasika religia verko....91
  *la*....88-95
  lando....548-555

lingvo....554, 555
litero....15, 16
majuskla....555-558
monato....94
multe-nombra....91
ne-esperantigita....337, 543-545
plurvorta....555
popolo....548-555
propra....88-95, 404, 405
semajntago....94
sezono....94
tagoparto....94
virina....547, 548
Nomspeco....543
NP, elparolo....27
*Nu*....330
Nuancilo de nombro/kvanto....377-380
*Nul*....75, 363-366, 373
*Nula*....376
*Nulo*....365, 373
Numeralo = nombra vorteto....711
Numero....93, 367, 384, 404
*Nun*....261-263
nerekta parolo....534
pasinteco....262
Nun-tempo....412
*Nuna*, *nun(ec)o*....262
*Nur*....285-287
deziro....415, 524
kun *povi*, *deziri*, *voli*....286
*Nura*....287
NV, elparolo....27

**O**

O....
elparolo....23, 24
finaĵo....43-49, 240
liternomo....15, 16, 312, 313
tabela postparto....240
*O kej*....332, 333
O-eca vorteto....708
O-finaĵo....43-49, 240
lingvonomo....86, 554, 557
nombra vorteto....373
nombrovorto....372-374
participo....439-441
perverba priskribo....395
propra nomo....544
vortfarado....566, 582
O-vorta frazparto....59-63, 708
O-vorteca vorteto..105-126, 297-313, 708
O-vorto....43-49, 708
aga....106
duobla....405-409
grupa....177
ina....44, 45, 48
kvanta....387
nenombrebla....68
nombrebla....68-70, 592
perverba priskribo....395, 401
priskribo....59-66
seksa signifo....44-49
sekse neŭtrala....44, 48
subkomprenata....366
uzo....43, 44
vira/virina....44, 45, 48
virina....45
Objekta predikativo = perverba priskribo de objekto....711
Objekta verbo....458, 459, 462-464, 608-612, 707
Objekto....39, 40, 43, 131-134, 454-456, 708
alternativa....131, 462
demovo, elmovo....139
duobla....496
*ke*-frazo....495, 496
kunmetaĵo....579, 580
nerekta....197, 707
perverba priskribo....398, 400-404
plurobla....423, 424
rekta....131-134, 709
senca....106, 154, 199, 309, 439-441
*signifi*....560
OBL....625-627
*Oble*....381, 382
formato....382
Oficiala....
afikso....587-659
prefikso....635-649
sufikso....588-635
OFON (sufikso)....670, 700
OID (sufikso)....671
OJD (sufikso)....671, 700
*Ok*....363-365
*Okazi*....458
postmetita subjekto....134
*Okupi*....452
*Ol*....64-66, 165, 339-347
anstataŭ *kiam*....517
frazenkondukilo....530

objekto.................................341-344
rolmontrilo............................341-344
subjekto.................................341-344
OL (sufikso).......................................671
OLOG (sufikso)................................671
OLOGI (sufikso)...............................672
OM-vorto..............................................
malnova uzo...................................391
O-vorteca..............................390, 391
OMETR (sufikso)......................672, 701
OMETRI (sufikso).....................672, 701
ON..........................................627, 628
ON-vorto...............................................
E-finaĵo........................................377
prefikseca....................................651
*Oni*..................................105, 114, 115
anstataŭ *ni*....................................115
*Onia*..........................106, 107, 114, 115
*Onin*............................................114
ONT.......................................435-447
OP..........................................628, 629
*Opinii*..........................................460
Orda numeralo = vicorda nombrovorto.... 711
Ordo alfabeta...........................15, 16, 20
Ordona frazo....................................486
OS-finaĵo.................................413, 414
OT....................................435-447, 451
OTEK (sufikso).........................672, 701
OŬ (sonkombino)...............................28
OZ (sufikso)....................................673


## P


P, elparolo....................................25-27
PAG. . .24, 124, 280, 380, 402, 536, 563, 713-716
*Pagi*..................................................462
Paragraf-signo..................................20
*Pardoni*..........................................462
Parenco....................................691-693
Parentezo.........................................18
*Parento*..............................48, 642, 666
Parolo....................................................
nerekta...................500, 531-536, 707
rekta......................531-536, 560, 709
Participo............................435-447, 708
A-finaĵo................................435-437
aktiva..................................154, 435
ANT.....................................442, 445
AT.................................444, 445, 451
E-finaĵo..................................437-439
elekto....................................451-454
INT.......................................................442
IT.................................444, 445, 451
neebla........................................435
O-finaĵo..........................154, 439-441
ONT.....................................414, 442
OT.................................444, 445, 451
pasiv.......................................435, 436
peras priskribon.............................403
UNT.............................................437
UT...............................................437
Pasinta tempo............................412, 413
Pasiva participo..................397, 435, 436
senobjekta verbo............................435
Pasivo............................38, 449-456, 708
alternativo....................................445
kontrolesprimoj..............................451
participo........................................451
perverba priskribo..........................399
sensubjekta.............................449, 450
*Paŝo post paŝo*...........................234, 235
Paŭzeto distingiga................................31
PEBI (prefikso)..........................682, 701
*Per*.....................................................218
mezuro..........................................220
*Per* kaj *kun*..........................................215
*Per si (mem)*..............................126, 220
*Pera, pere*..........................................221
*Pere de*..............................................232
*Peri*....................................................221
*Perlabori*............................................221
Persona pronomo................105, 156, 708
N-finaĵo........................................105
Personalo, personpronomo = pronomo, persona pronomo..............................711
Perverba priskribo. 39, 40, 44, 51, 52, 56, 123, 129, 395-404, 708
A-vorto.................................400, 402
aga verbo................................52, 399
E-vorto..........................................401
I-verbo..................................403, 421
kontrolmetodo...............................403
*kun*......................................................403
*la*..........................................................84
O-vorto.........................................401
objekto............123, 124, 398, 400-404
participo........................................403

sen subjekto....................................397
subjekto..........................123, 395-400
PETA (prefikso)................................681
*Peti*.........................................131, 462
PIKO (prefikso)................................681
PIV…280, 331-333, 565, 585, 697-704, 719
PJ (sufikso)...............................670, 701
*Plaĉi*..............................................460
*Plej*..............................86, 288, 390, 391
memstare....................................290
ŝajne mallogika.............................291
*Pleja*, *Pleje*.......................................291
*Plejeble*...........................................290
*Plejsupera*.......................................292
*Plejsupero*.......................................292
Plena Analiza Gramatiko de Esperanto.... 24, 124, 280, 380, 402, 536, 563, 713-716
*Plena de/je*.......................................146
Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. 280, 331-333, 565, 585, 697-704, 719
*Pli*......................287, 326-328, 390, 391
*ju ... des*...............................326-328
memstare....................................290
ŝajne mallogika.............................291
*Pli* kaj *plu*.......................................264
*Pli ol*...............................................339
nuancilo de nombro/kvanto...........380
nuancilo de vorto...........................343
*Pli ol unu*...........................................75
*Plia*, *plie*.........................................291
Plozivo = eksploda konsonanto…25, 711
*Plu*.........................................263, 264
*Plu ne*..............................................263
*Plua*, *plue*, *pluen*...............................264
*Pluraj*.........................................75, 388
Pluralo = multe-nombro..........67-76, 711
*Plus*...........................322, 323, 381, 382
anstataŭ *kaj*...................................322
N-finaĵo........................................322
rolvorteto......................................322
signo...............................................19
*Pluso*...............................................323
*Pluvi*...............................................457
*Po*...................................................221
erara uzo..............................223, 382
forlaso..........................................382
neunueca uzo................................379
nuancilo de nombro/kvanto.....377, 378
pozicio..........................................221
prefikseca.......................................380
signifo...........................................221
*Po* (liternomo).................15, 16, 312, 313
Poezio. 75, 78, 88, 96, 101, 102, 207, 248, 391, 469, 470, 566, 618, 638, 645, 649
Popolnomo.................................548-555
*Por*..................................................223
forlaso...........................................496
frakcistreko...................................227
I-verbo...........................295, 426, 427
pagado, aĉetado, vendado...............226
senca subjekto................................419
*Por* kaj *pro*.......................................229
*Por ke*..........................227, 496, 497, 501
*Por tio ke*............................227, 496, 497
Poseda pronomo............53, 106, 107, 708
difinilo........................................95-97
J-finaĵo..........................................106
N-finaĵo.........................................106
Posedo.................106, 107, 152, 309-311
Posedpronomo = poseda pronomo......711
*Post*.................................................183
horo.......................................383, 384
I-verbo...........................................429
komparo.........................................183
sinsekvo.........................................183
*Post ke*.............................................530
*Post kiam*............184, 429, 443, 516, 530
*Post ol*.............................................530
*Posta*, *poste*.......................................185
*Postmorgaŭ*.......................................257
nerekta parolo.........................534, 535
Postparto de tabelvorto........................237
Postpriskribo.........................................63
*Potenco*.....................................381, 382
POV (sufikseca).................................651
*Povi*....................................419, 476-481
*Povus*...............................................481
PRA.........................................647, 648
GE kaj BO.....................................636
PRE (prefikso)...................................678
*Pre* (rolvorteto).................................678
Preciziga antaŭelemento...............573-580
Predikativo = perverba priskribo.........711
Predikato = ĉefverbo...........................711
*Preferi al/ol*.......................................349

Prefikseca
- BIT 650
- *ĉi* 249, 657
- *de* 658
- DUON 692
- *el* 655
- *fi* 657
- FIN 655
- *for* 655
- FUŜ 650
- *inter* 371
- *kun* 216
- *kvazaŭ* 658
- *mem* 658
- ON-vorto 651
- *po* 380
- *pri* 468, 656
- RET 652
- rolvorteto 653-657
- SAT 655
- *sin* 658, 659
- ŜTEL 652
- *tra* 655
- VIC 651, 652, 692
- VIR 46, 652

Prefikso 587-659, 661-683, 708
- greka/latina 661
- neoficiala 674-683
- oficiala 635-649

*Preni* 458

Prepoziciaĵo = rolvortaĵo 231-234, 711

Prepozicio = rolvorteto 711

Prepozitivo = frazparto kun rolvorteto 711

*Preskaŭ* 292
- kaj *apenaŭ* 280

*Preskaŭ* kaj *kvazaŭ* 283

*Preter* 185

*Pretere* 186

Preterito = pasinta tempo 412, 413, 711

Prezenco = nun-tempo 711

*Pri* 228
- demanda subfrazo 505
- forlaso 496, 504, 505
- helpa 539
- I-verbo 428
- *ke*-frazo 497
- prefikseca 468, 656

*Pri (tio) ke* 497

*Pri ĉu* 505

*Pri kiel* 505

*Pria* 228

*Prie* 228

Primitiva adverbo = E-vorteca vorteto 245-296, 712

*Prirabi* 468

*Prisemi* 468

Priskriba verbo 52, 395-400, 457, 460

Priskribo 41, 708
- A-vorto 64, 65
- E-vorto 64-66
- identiga 129, 404, 405
- mezura 138
- O-vorto 59-66
- perverba 44, 51, 52, 56, 129, 395-404, 708
- propranoma 404, 405
- rekta 41, 709
- rolvorteto 144-235
- speciala 395-409
- vorteto 64, 65

*Pro* 229
- anstataŭ *por* 229
- I-verbo 429
- *ke*-frazo 230, 497
- pagado, aĉetado, vendado 230
- = *anstataŭ* 230

*Pro (tio) ke* 429, 497

Procento-signo 20

Profesio 623-625

*Proksime de/al* 200

Proksimumeco 170

*Promesi* 422

Pronomeca vorteto 297-313, 708

Pronomo 105-126, 709
- J-finaĵo 106
- N-finaĵo 105, 106
- nerekta parolo 535, 536
- persona 105, 708
- poseda 53, 106, 107, 708

Pronomo = (persona) pronomo, pronomeca vorteto, O-vorteca vorteto, A-vorteca vorteto 712

Prononco = elparolo 712

Propozicio = frazo 712

Propra nomo 88-95, 404, 405, 543-558
- citaĵa 543
- ĉu esperantigi? 543
- dividostreko 18
- el ordinara radiko 543
- elparolo 543-545

esperantigita............................545-548
finaĵo....................................544, 545
ina.........................................547, 548
klasika religia verko........................91
*la*.............................................88-95
lando.....................................548-555
lingvo...................................554, 555
majuskla................................555-558
multe-nombra...............................543
ne-esperantigita..............337, 543-545
ordinara O-vorto..............................91
origina formo.........................543-545
plurvorta.......................................555
speco............................................543
virina...................................547, 548
PROTO (prefikso).............................679
PSEŬDO (prefikso)...........................679
Pseŭdoafikso = eksafikso…585, 586, 712
Punkto..................................................17
decimala.......................................381
Punktokomo.........................................17

## R

R, elparolo....................................25-27
R, kartava............................................27
R, uvula...............................................27
Radiko........................................37, 709
A-vorta/A-karaktera.......................565
adjektiva……565, 566, 579, 590, 596, 608, 612, 631
afikseca.................................649-659
aga. 565, 567, 572, 588, 590, 608, 612
eca.565, 566, 579, 590, 596, 608, 612, 631
gramatika karaktero...............563, 564
grupa.............................................69
matematiko...........................381, 382
ne-eca..........................................567
neŭtrala pri nombro...................67, 68
nuda.............................................331
O-vorta/O-karaktera.......................565
sekse neŭtrala............................44, 48
substantiva....................................565
verba…565, 567, 572, 588, 590, 608, 612
verbkaraktera................................565
vira/virina.......................................45
Radikokaraktero = propra signifo de radiko..............................................712
Radikvorto..........................................37
RE...........................................648, 649
Reala modo. .411-414, 502, 523, 529, 709
*Reciproke*...........................................371
Refleksiva pronomo = *si*, *sia*...............712
Reformo.13, 48, 115, 241, 253, 336, 444, 666
Rekta objekto.......................131-134, 709
demovo, elmovo.............................139
Rekta parolo................531-536, 560, 709
Rekta priskribo.............................41, 709
I-verba.....................................424, 425
Rekta verbigo de A-vorto....................470
Respondvorto..............................357-361
*Resti*.....................................................398
postmetita subjekto.........................134
RET (prefikseca)................................652
RETRO (prefikso)..............................679
*Ri*................................105, 111, 115, 336
*Ria*.............................................106, 115
RIĈ (sufikseca)...................................650
Riismo.......................................111, 115
Rilata KI-frazo.....................506-523, 532
Rilata KI-vorto....................506-523, 709
Rilata subfrazo............505-523, 532, 709
Rilativa = rilata...........................506-523
Rilativo = rilata KI-vorto.….506-523, 712
*Ro* (liternomo).................15, 16, 312, 313
Rolfinaĵo........................39, 127-235, 709
Rolmontrilo....................39, 127-235, 709
duobla............................................145
Rolvortaĵo...........................231-234, 709
Rolvorteto......................39, 127-235, 709
A-finaĵo.........................................234
AM-vorto.......................................253
anstataŭ N-finaĵo.............................150
apudmeto.......................................406
demanda subfrazo...........................505
direkta...................................196-206
E-finaĵo..................................231-234
E-vorto..........................................144
forlaso...................................234, 235
I-verbo...................................425-430
*ke*-frazo.........................................497
kompara................................348, 349
loka.......................................163-196
loka vorteto....................................144
memstara.......................................234
nedifinita................................145-147
neoficiala...............................335, 336
nova...............................................233

objekto.....134
prefikseca.....653-657
tempa vorteto.....144, 257
vortfarado.....653-657
RONA (prefikso).....681, 702
Rondeco de vokalo.....24
RONTO (prefikso).....681, 702


## S


S, elparolo.....25, 26
*Saluton*.....489
*Sama*.....53
*Sama kiel/same kiel*.....339
*Same kiel, samkiel*.....347
*Samo*.....53
SAN (prefikso).....679
SAT (prefikseca).....655
*Se*.....523, 524
deziro.....524
I-verbo.....431, 432
*Se* kaj *ĉu*.....506
*Sed*.....320-322
KI-vorto.....539
*kvankam*.....528
vortostumpoj.....323
Sekse neŭtrala.....44, 48, 618, 633
Sekso.....44-49, 693
nekonata.....110
*Sekv(ant) a*.....256
*Sekve*.....280
Semajntago.....94, 139, 557
SEMI (prefikso).....680
*Sen*.....231
Senca objekto.....106, 154, 309, 439-441
Senca subjekto. 309, 335, 417, 419, 420, 422, 423, 432, 433, 439-441
*Senigi*, *seniĝi*.....231
Senobjekta verbo.....458, 464-467, 710
pasiva participo.....435
Sensubjekta verbo.....113, 397, 457, 469, 710
*Senti sin*.....400
*Senviva*.....567
Senvoĉa konsonanto.....26, 27
Senvoĉigo.....27
*Sep*.....363-365
*Sepen*.....336, 364
*Ses*.....363-365
Sezononomo.....94
*Si*.....105, 115-126
aga O-vorto.....120
Apudmeto.....124
fiksita esprimo.....126
I-verbo.....119
IG-verbo.....125
kompara esprimo.....122
kompleksa frazo.....118-126
kompleksa frazparto.....123
kompleksa rekta priskribo.....123
participo.....121
perverba priskribo.....123
reciprokeco.....371
simpla frazo.....116-118
subfrazo.....118
unua aŭ dua persono.....125
*Sia*.....106, 107, 115-126
= *ĝia propra*.....126
*Siatempe*.....126
Signifo.....
radiko.....566
vortelemento.....563-565
Silabo.....31
divido.....31
duonvokalo.....29
J kaj Ŭ.....29
Simbolo.....
en PMEG.....695
matematika.....16-21
*Sin* (prefikseca).....659
Singularo = unu-nombro.....67-76, 712
*Sis*.....336, 364
Skribo.....15-21
dato.....385
*So* (liternomo).....15, 16, 312, 313
*Sob*.....336
*Sola*.....287
anstataŭ *sole*.....57
*Sole*.....286
Solstariva lingvoelemento = vorteto....712
Sonimito.....28, 329-333
*Sor*, *sori*.....336
Spaceto.....16, 365, 375
Speco.....
*la*.....84
multe-nombro.....84
unu-nombro.....83
*Spite*.....233, 498
*Spite al*.....233

*Spite ke*......498, 529
Statoŝanĝo......175, 199
Steleto......18
STIF (prefikso)......651, 702
STIL (sufikseca)......652
*Stop*, *Stopi*......332
Streĉita vortfarado......584, 585
Streketo......19, 103
Streko......
  divida......18
  ĝis-streko......19
  halta......18
*Sub*......186
  E-vorteca......378
  kovra......186
  nuancilo de nombro/kvanto…377, 378
*Suba*, *sube*......187
Subfrazo......41, 61, 493-536, 710
  *ĉar*-frazo......525
  demanda......17, 503-506, 531
  disigita......493
  *dum*-frazo......526
  komo......17
  kompleksa......494
  mallongigita......431
  pozicio......493
  priskribo......65, 66
  rilata......505-523, 709
  *se*-frazo......523, 524
  sensubjekta......541
*Subigi*, *subiĝi*......187
Subjekta predikativo = perverba priskribo de subjekto......712
Subjekta verbo......458, 710
Subjekto......39, 40, 43, 127, 128, 710
  E-participo......437
  forlaso......489, 490
  I-verbo......418, 419
  *ke*-frazo......494, 495
  maltipa......128
  perverba priskribo......395-400
  senca…309, 335, 417, 419, 420, 422, 423, 432, 433, 439-441
  subkomprenata......414
  tipa......127
  U-verbo......489
Subjunkcio = frazenkondukilo…494, 712
Subpropozicio = subfrazo......712
Substantiva radiko = radiko nek aga, nek eca......712
Substantivo = O-vorto......712
Subtraho......322, 323
*Sufiĉe*......388-390
Sufikseca......
  AM......603, 649
  FIN......650
  LAND......549, 550, 651
  POV......651
  RIĈ......650
  STIL......652
Sufikso......587-659, 661-683, 710
  greka/latina......661
  neoficiala......662-674
  oficiala......588-635
*Super*......188
  E-vorteca......378
  labortasko......189
  nuancilo de nombro/kvanto.....377, 378
*Supera*, *superi*......190
Supersigno......16
Suplemento = rekta priskribo......712
*Supre* kaj *super*......190
Suprenstreko......18
  anstataŭ *aŭ*......319
*Sur*......190
  figura......192
*Suspekta*......569

## Ŝ

Ŝ, elparolo......25, 26
Ŝajnafikso......585, 586, 710
*Ŝajni*......395-400
*Ŝati*......460
*Ŝi*......105, 110, 111
  besto......112
  infano......111
  nevivaĵo......112
*Ŝi aŭ li*......111
*Ŝia*......106, 107, 110, 111
*Ŝillero*......33
*Ŝo* (liternomo)......15, 16, 312, 313
ŜTEL (prefikseca)......652
*Ŝtele*......652
*Ŝteli*......459

## T

T (sufikso)......673
T, elparolo......25-27

Tabelvorto....237-243, 710
- aga....473
- direkta....238
- je A....98, 240, 307-309
- je A kaj U (diferenco)....301
- je AL....265-267
- je ALI....241-243
- je AM....251-253
- je AN (arĥaika)....253
- je ĈI....239, 240
- je E....240, 245-247
- je EL....267-271
- je EN....142
- je ES....98, 309-311
- je I....239
- je KI....238, 239, 355, 538
- je NENI....240
- je O....101, 240, 301-306, 511
- je OM....156, 237, 272-276, 390-392
- je TI....239, 282, 520-523
- je U....98, 240, 297-302
- loka....142
- nedisigebla....240
- postparto....240
- rolvorteto....246

Tabelvorto je KI....506-516

*Tagiĝi*....457

Tago....384, 385

*Tamen*....292, 293, 321, 528
- anstataŭ *sed* aŭ *kaj*....322
- nea demando....360

*Tamen* kaj *kvankam*....293

TC, elparolo....33

TĈ, elparolo....33

TEBI (prefikso)....682, 703

TEK = OTEK (sufikso)....672

TELE (prefikso)....680

*Temi*....457

Tempismo (= atismo)....453, 454

Tempo....411
- nuna....412
- pasinta....412, 413
- venonta....413, 414

Tempopunkto....225
- sen rolmontrilo....139

Tenso = tempo....712

TERA (prefikso)....681

Termino gramatika....705-716

TERMO (prefikso)....680

TET (sufikso)....673

TĜ, elparolo....33

TI-vorto....239
- forlaso....520-523
- *kiel*....339

*Tia*....307-309
- helpa....529
- postmetita....62

*Tia kia*....522

*Tiaĵo*....240, 309

*Tial*....265-267

*Tial ĉar*....525

*Tial* kaj *ĉar*....266

*Tial ke*....525

*Tial kial*....522

*Tiam*....251-253
- forlaso....521
- helpa....524

*Tiam kiam*....521

*Tiama*....253

*Tian = tiam*....253

*Tie*....245-247
- subkomprenata....517

*Tie for*....248

*Tie kie*....521

*Tiel*....267-271
- helpa....529

*Tiel ke*....501

*Tiel kiel*....522

*Tiel longe ĝis*....527

*Tiel same kiel*....347

*Tiela*....271

*Tiele*....271
- respondvorto....361

*Tien*....142, 246

*Ties*....98, 309-311

*Ties kies*....522

*Timi* + nea U-verbo....503

*Tio*....302-306
- helpa....112, 495-497, 499, 503-506

*Tio estas*....406

*Tio* kaj *ĝi*....304

*Tio ke*....498

*Tio kio*....521

*Tiom*....272-276, 390, 391
- limiga....275

*Tiom kiom*....522

*Tiom multe*....274, 392

*Tiom pli*....275

*Tiom same*.......274
*Tiom-kiom*-ismo.......162, 276
*Tioma*.......276
Titolo.......92, 128, 129, 404, 560, 561
*Tiu*.......297-302
anstataŭ *la* + O-vorto.......299
anstataŭ *li*/*ŝi*.......111
anstataŭ *li*/*ŝi*/*ĝi*.......298
forlaso.......521
helpa.......507
*Tiu for*.......248
*Tiu kiu*.......520
*Tiu-ĉi*.......247
*To* (liternomo).......15, 16, 312, 313
Tononomo.......337
*Tra*.......193
prefikseca.......655
*Tra* kaj *trans*.......195
Tradicia gramatika vorto.......711-716
*Trae*.......194
*Traigi*.......194
*Trans*.......194
*Transa*, *transe*.......196
Transitiva verbo = objekta verbo.......458, 459, 462-464, 573, 712
*Tre*.......293, 294
neado.......294
*Treege*.......294
Trema konsonanto.......25
*Tri*.......363-365
Tria persono.......109-115
*Triiliardo*.......668
*Triiliono*.......668
*Triliono*.......372, 668
Tripunkto.......17
*Tro*.......294-296, 390, 391
neado.......295
*Troa*, *troigi*.......296
TS, elparolo.......28
TŜ, elparolo.......28
*Tuj*.......265
*Tuja*, *tuje*.......265
*Tuta*.......400
*Tuta la*/*la tuta*.......77

## U

U.......
elparolo.......23, 24
finaĵo.......240, 414, 415, 710
liternomo.......15, 16, 312, 313
tabela postparto.......240
U-finaĵo.......240, 414, 415, 710
U-modo.......
en programa menuo.......431
UJ.......629-631
landnomo.......630
UK (sufikso).......674, 703
UL.......631-633
ĈJ.......594
figura.......632
ULTRA (prefikso).......680
UM.......573, 633-635
anstataŭ IZ.......669
*Un'*.......102
UNT (participo).......437
*Unu*.......363-365
duondifina.......97, 369
evitado.......370
identeca.......368
pronomeca.......368
sameca.......368
speciala uzo.......367-371
*Unu mil*.......364
Unu-nombro.......67-76, 710
Unua persono.......107, 108
*Unuj*.......368
*Unun*.......369
*Ununura*.......287
*Unuo*.......374
US-finaĵo.......415, 416, 529, 706
*kvazaŭ*-frazo.......533
mildeco.......416
*se*-frazo.......416
tempe neŭtrala.......443
Uskleco, usklo.......15
UT (participo).......437

## Ŭ

Ŭ.......
elparolo.......25, 26, 28
nenormala.......28
nur post vokalo.......28
sonimito.......332
*Ŭo* (liternomo).......15, 16, 28, 312, 313

## V

V, elparolo.......25, 26
Vasta vokalo.......23

*Vatto*............33
*Vavo*............20
*Ve*............330
*Veka*............569
Vela konsonanto............25
Velaro = vela konsonanto............25, 712
Venonta tempo............413, 414
  IS-finaĵo............413
Verba finaĵo............411-416
  vortfarado............572, 573, 581
Verba finaĵo anstataŭ verbo............473
Verba radiko = aga radiko............712
Verbo............411-416, 710
  agoinflua............421
  *al*-komplemento............459
  AS-finaĵo............412
  dusignifa............452
  frazrolo............457-468
  grava............469-484
  I-finaĵo............411
  imaga modo............415, 416
  IS-finaĵo............412, 413
  *ke*-frazo............499-503
  kompleksa............468
  kunmetita............441-447
  *kvazaŭ*-frazo............533
  nerekta parolo............531-533
  nuntempa............412
  objekta...454-456, 458, 459, 462-464, 608-612, 707
  observa............423
  OS-finaĵo............413, 414
  pasinta tempo............412, 413
  pasiva............614
  pasivigebla............454-456
  postmetita subjekto............134
  priskriba............52, 395-400, 457, 460
  senobjekta.......454, 458, 464-467, 710
  sensubjekta....113, 397, 457, 469, 710
  subjekta............458, 710
  U-finaĵo............414, 415
  US-finaĵo............415, 416
  venonta tempo............413, 414
  vola modo............414, 415
*Vi*............105, 108, 109
  anstataŭ *oni*............115
  forlaso............414, 489
  subkomprenata............414, 489
*Via*............106-109
VIC (prefikseca)............651, 652, 692
*Vic' al*............207
*vicfilo*............651
*vicfrato*............636, 651
Vicorda nombrovorto. 367, 375, 376, 383, 384, 710
  E-finaĵo............377
  skribo............375
  vortordo............376
*vicpatro*............651
VIDEO (prefikso)............681, 703
*Vidi*............458
VIR (prefikseca)............46, 652
Vira radiko............44, 45, 48
Virina nomo............547, 548
Virina radiko............44, 45, 48
*Vo* (liternomo)............15, 16, 312, 313
Voĉa konsonanto............26, 27
Vokalo............23, 24, 710
  antaŭa............24
  duobla............32
  interliga............575, 576
  longeco............24
  malantaŭa............24
  malvasta............23
  mezvasta............23
  rondeco............24
  variado............24
  vasta............23
Vokativo = alvoko............128, 129, 712
Vola modo............414, 415, 710
*Voli*............419, 476-481
  ĝentila............479
  senobjekta............479
Volitivo = vola modo, U-modo, U-verbo.. 414, 415, 712
*Volu ...i*............415
*Volus*............481
Vortareto gramatika............705-712
Vorteto............710
  A-vorteca............297-313
  afikseca............657-659
  duobla............325-328, 408
  E-vorteca............245-296
  ekkria............329-333, 640
  kombinita............325-328
  kompara............339-347
  kunliga............315-323, 707
  kvanta............390, 391
  loka............245-251
  neoficiala............331-333, 335-337
  nombra............363-371

nova...38
O-vorteca...297-313
priskribo...64, 65
pronomeca...297-313, 708
superrigardo...37, 38
tempa...251-265
vortfarado...576
Vortfarado...563-586
A-finaĵo...566-570
E-finaĵo...571
frazetvortigo...580-584
kombino...573-580
neregula...586
O-finaĵo...566
preciziga antaŭelemento...573-580
strečita...584, 585
ŝajna...585, 586
verba finaĵo...572, 573
vortelementoj...563-565
vortklasa finaĵo...566-573
Vortigo de frazeto...580-584
Vortklasa finaĵo...37, 566-573, 710
Vortludo...585, 586
Vortokunfando...586
Vortordo...39, 537-542
*ajn*...276
*almenaŭ*...278
*ankaŭ*...278
*apenaŭ*...279
*eĉ*...281
emfazo...537
frazparto...537, 538
*mem*...284
nekutima...63, 538-542
*nur*...285
*plej*...287
*pli*...287
*preskaŭ*...292
priskribo...62
*tre*...293
*tro*...294
Vortostumpoj...323
Vortotranĉado...18, 21, 31
*Vuo* (W)...20

## Z

Z, elparolo...25, 26
ZEBI (prefikso)...682, 703
ZEPTO (prefikso)...681
ZETA (prefikso)...681
*Zo* (liternomo)...15, 16, 312, 313

## Ceteraj

16 reguloj...685-690
Q...20
elparolo...34
literumado...313
W...20
elparolo...34
literumado...313
X...20
anstataŭ supersigno...16
elparolo...34
literumado...313
X-skribo...16
Y...20
elparolo...34
literumado...313
*'stas*...32, 103
ß (*esceto*)...20